

ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO

I. VOLUMO

REDAKTIS:

L. KÖKÉNY kaj V. BLEIER

LA LINGVO-FAKON:

K. KALOCSAY

INICIATINTO-ĈEFREDAKTORO:

I. ŜIRJAEV †

— UNUA ELDONO —

1933

L I T E R A T U R A M O N D O , B U D A P E S T

Reprodukto, ekstrakto en kiun ajn lingvon
nur kun la permeso de la eldonejo

Esper. 318 II



KUNLABORANTARO

- Adams W. G., Seattle (Usono).
Agricola G., Genève
Arnessen Arne, Oslo
Atanasov D. Atanas, Sofia
Balkányi Pál, Budapest
Baranyai Imre, Budapest
Bastien Louis, Paris
Behrendt Arnold, Berlin
Bennemann Paul, Leipzig
Bruin Gerrit Paulus, Enschede (Ned.)
Butler Montagu Christie, London
Capdevila Eduard, Barcelona
Chavet Gabriel, Lille
Carreira Saldanha Jorge, Lisboa
Domingues Carlos, d-ro, Rio de Janeiro
Dreher Leopold, d-ro, Kraków
Facchi Gaetano, Brescia (It.)
Flageul Pierre, Issy (Franc.)
Friis Lorenz, Aabyhøj (Dan.)
Grosjean-Maupin Emile, † Nice
Heilskov Christian, Aarhus (Dan.)
Indra Talivaldo, Riga
Isbrücker Julia, Den Haag
Johnson Wilfred B., Birmingham
Kamaryt Stanislav, d-ro, Bratislava
Karczag György, Budapest
Kawasaki Naokazu, Osaka
Kenn Won, d-ro, Canton
Kreuz Robert, Genève
Kuwahara Tosihido, Osaka
Lappi Lauri Ilmari, Riihimäki (Finn.)
Nekrasov Nikolaj Vlad., Moskva
Nylén Paul, Stockholm
Ossaka Kenji, Tokio
Page William Main, Edinburgh
Pfeffer Emil, d-ro, Wien
Redondo Fernando, Madrid
Róbin Wilhelm, d-ro, Warszawa
Rollet de l' Isle M., Paris
Sakaria Hillar, Tallinn
Seppik Henrik, Tallinn
Simon Otto, Wien
Solzbacher Wilhelm, d-ro, Luxembourg-Eich
Stamatiadis Anakreon, d-ro, Athen
Stancliff Fenton, Acron, (Usono)
Stefančić Jakob, d-ro, Beograd
Steiner Hugo, Wien
Stroele Georges, Neuchatel (Svis.)
Szilágyi Ferenc, d-ro, Budapest
Takács József, d-ro, Nagymaros
Tarnow Paul, Düsseldorf-Oberkassel
Thomson L. E. Pymble, (Aŭstralio)
Totsche Lajos, Budapest
Venture Alec, Mitcham (Brit.)
Waringhien Gaston, Lille
Wiesenfeld Edvardo, Warszawa
Zon Wigbertus van, Reusel (Ned.)

La lingvan fakon redaktis: K. Kalocsay, d-ro, Budapest.

VERKIS ARTIKOLOJN AŬ DONIS VALORAJN KONSILOJN:

Azorin Francisco, Cordoba (Hisp.)	Lafiovicki Pinhas, Jerusalem
Baghy Gyula, Budapest	Lanti Eugeno, Paris
Banham Reginald, Melbourne	Litauer Józef, Warszawa
Bánó Miklós, d-ro, Budapest	Major Jozefo, Kameoka (Jap.)
Barcelo A. Juan, Palma de Mallorca	Marks Muto, (Jap.)
Berger Amalie, Wien	Mc. Cormick F. R. A., Dublin
Butkus Vladas, Kaunas	Mihalik József, Budapest
Bünemann Oscar, Hamburg	Morariu Eugenia, Cluj (Rum.)
Cachon Hector, Eaubonne (Franc.)	Morariu Tiberio, Örebro (Sved.)
Cogen Léon, Ninove (Belg.)	Mudrak Walter, Wien
Csutak Ferenc, Budapest	Nebenzahl Karl, Wien
Cang Soktaj, Seoul (Koreujo)	Nikolov Atanasov, Sevlievo (Bulg.)
Debrouwere Gerard, Kortryk (Belg.)	Pino Andres, Valencia
Dresen Hilda, Tallinn	Rodriguez M. C., Mexiko
Filliâtre Petro, Paris	Sepulveda Cuadra L. E. Santiago
Filliâtre Roberto, Paris	Sidlovskaja M. (Rusl.)
Fischer Henriko, Bucuresti	Sindo-Seitaro, Osaka
Godek Ivo, Zagreb	Teuchner Paul, Leipzig
Habert J., Oujda (Maroko)	Weinhengst Hans, Wien
Hájek Frantýšek, Praha	Yelland Ernest Edward, Aspremont (Franc.)
Halka László, Budapest	Yoxon Geo. H., Heswall (Brit.)
Hübner Paul, Quedlinburg (Germ.)	Zamenhof Lidja, Warszawa
Jagoda Mauricio, La Ceiba (Honduraso)	Zauner Jozef, Timișoara (Rum.)
Johanson John, Stockholm	
Klimas A., Kaunas	La nomoj de multaj helpantoj aŭ konsilantoj troviĝas ĉe fino de la artikoloj.
Krestanov Ivan H., Sofia	
Kürsteiner Hans, Sankt Gallen (Svis.)	

KLISOJN KAJ FOTOJN AFABLE PRUNTEDONIS:

Universala Esperanto-Asocio, Genève.
Int. Cseh-Instituto, Den Haag.
Internacia Esperanto-Muzeo, Wien.
Heroldo de Esperanto, Köln.
Brita Esperanto-Asocio, London.
Schuck, Fritz, Bremen
Ellersiek, Friedrich, Berlin.
kaj multaj aliaj.

ANTAŬPAROLO

»Manko en nia literaturo de informlibro, kie Esperantistoj, precipe kursgvidantoj kaj kursanoj, povus senpene kaj rapide trovi koncizajn kaj ĝustajn sciigojn, necesajn al ili pri kio ajn rilatanta al la Esperanto-movado, kie estus koncentrigitaj kaj eternigitaj biografiaj notoj pri kiel eble plej multaj memorindaj agantoj de la movado, kaj cet., igis min entrepreni tiun ĉi malfacilan taskon, al kies plenumo mi dediĉis tutajn jarojn da laborado.« Tiujn vortojn ni legas en la antaŭparolo (apr. 1930) de Ivan Sirjaev, kiu en 1931 sendis sian laboraĵon al Literatura Mondo en sep malgrandaj kaj unu granda manskribitaj kajeroj. Tiu ĉi materialo estis la kerno kaj elirpunkto de la Enciklopedio de Esperanto kaj Ivan Sirjaev (mortinta en 1933), el kies artikoloj ni uzis multajn por la nova verko, fariĝis pro sia iniciato ĝia ĉefredaktoro. Estas dolore bedaŭrinde, ke li ne povis ĝisvivi la disbranĉigon de la arbo, kiu kreskis el la nobla semo de lia valora iniciato. Ni kredas, ke la verko ne malinde gardos lian karan memoron.

Dum la plivastigo de la Sirjaeva bazo, la celdifino multe plilarĝiĝis. En 1931 ni jam antaŭvidis ĉirkaŭ 440 paĝojn da teksto kun 3000 literoj paĝe kaj 200 paĝojn da bildmaterialo. La unua paŝo estis la varbo de kunlaborantoj. Pri ĝi ni tiom sukcesis, ke ni povas nomi la Enciklopedion la sola verko, pri kiu kunlaboris anoj de ĉiuj tendencoj en nia movado. Sed ĉi tiu sukceso samtempe pli kaj pli kreskigis la paĝonombron, tiel ke post laboro de tri jaroj, la redaktoroj liveris al la eldonejo tekston por 640 paĝoj kun po 4200 preslitteroj kaj bildmaterialon por ĉirkaŭe 300 paĝoj. — Pli ol la duoblon de la antaŭfiksita amplekso! — Dank' al tio, la verko nun estas ne nur simpla manlibro por elementaj bezonoj, sed verko taŭga ankaŭ por pli altaj pretendoj de propagandistoj, literaturistoj, lingvistikemuloj. Ĝi etendiĝas sur ĉiuj kampoj de la E-a vivo: movado, lingvo, literaturo.

Pri la grandega laboro de redakto orientu, ke la redaktoroj skribis dum tri jaroj plurajn milojn da leteroj (el kiuj cetere ne malgranda parto ne ricevis respondon), tiel ke por la afrankado de leteroj kaj cirkuleroj la eldonejo elspezis sume kaj runde 800 frankojn svisajn.

Oni povas demandi, ĉu la Enciklopedio do estas kompleta? Nu, oni

ripensu, ke neniu Enciklopedio povas kontentigi dezirojn ĉiuf flankajn. Kaj oni ne forgesu, ke tiu ĉi verko estas la unua en sia speco: tia tasko havas malfacilojn nevenkeblajn per unu salto. Do, kiu havas la pasion serĉi mankojn, tiu ja trovos tiajn certe.

Intenca manko estas, ke ni ne pritraktis vaste aliajn lingvojn artefaritajn, sed prezentis ilin nur skize kaj tute ne komplete. La verko ja estas ne enciklopedio de mondlingvoj, sed Enciklopedio de Esperanto.

Mankhava estas la bildmaterialo, kvankam ĝi entenas kvanton ne troveblan en ĉiuj gazetoj, historiaj libroj kaj albumoj kune. Tamen, ĝi ŝajnas ankoraŭ nekontentiga. Dua eldono, espereble baldaŭ, certe pliperfektigos ĉi-rilate.

Oni povus riproĉi, ke la amplekso de artikoloj ofte ne estas proporcia, ekzemple kelkaj landoj aŭ personoj estas pli koncize prezentitaj ol aliaj eble pli gravaj. Ties kaŭzo estas, ke diversaj kunlaborantoj diverskvante transpasis la limojn de amplekso fiksita al ili, kaj, se la artikolo estis interesa, ni ne volis ĝin kripligi por malpli gravaj konsideroj. Aliflanke, se la kunlaboranto ne transpasis la limojn (kiel ekz. en la artikoloj pri Britujo), liaj artikoloj nun relative ŝajnas tro mallongaj. La longo de la artikolo do tute ne mezuras la gravecon de temo aŭ persono.

Malgraŭ zorga serĉado kaj kribrado, eble kelkaj artikoloj ŝajnos superflujaj, dum kelkaj necesaj eble mankas. La mankojn eventuale kompensas eldonota suplemento.

Ĉe kunlaboro de multaj personoj ne estas eviteblaj kelkaj opinio-diferencoj. Ne ĉiun opinionon ni aprobas senrezerve, sed en subskribitaj artikoloj ni devis respekti la konvinkigon de la kunlaboranto.

Kompreneble ne ĉiuj artikoloj estas verkitaĵoj egale interese. Ofte mankis al ni tempo por akiri ion pli verve skribitan kaj ni devis tion lasi por la dua eldono.

Sed antaŭ ol severe kritiki, bonvolu konsideri la neimageblajn malfacilaĵojn. Vere, en multaj kampoj la laboro estis nura kompilo kaj resumo el ekzistantaj verkoj, precipe la internacia historio de la movado kaj la lingvaj pritraktoj estas troveblaj ankaŭ aliloke en vere bonaj verkoj. Tamen, ankaŭ en tiuj fakoj oni trovas multajn interesajn detalojn, precipe pri la laboro en diversaj profesioj, pri kiu ni havis ĝis nun nur tre nekontentigajn informojn. Kaj en multaj kampoj ni devis fari esplorojn tute sen antaŭa bazo, ekzemple pri la naciaj historioj de la movado, aŭ pri la biografioj, kiuj prezentas la vivon de proksimume 1500 esperantistoj.

Rubriketoj pri ĉ. 450 libroj kontentigos ĉefe la libroamantojn. Ni zorge studis la tutan librotrezoron de Esperanto kaj preskaŭ ĉiuj iom gravaj libroj estas prezentitaj kun la plej necesaj bibliografiaj indikoj kaj krome, kun koncizaj sciigoj pri la speco kaj enhavo. Ĉe la plimulto ni ĉerpis la ka-

rakterizajn notojn el recenzoj, aperintaj en la gazetaro. Tio havas la utilon, ke esploranto povas reiri al la fonto kaj tie trovi pluajn detalojn pri la libroj. Ĉar ni aldonas ankaŭ la biografiojn de niaj verkistoj, kun la listo de iliaj verkoj, kaj ofte ankaŭ kun komentarioj kaj valorjuĝoj, kaj ĉar ni resumas en aparta artikolo pri la historio de la Esperanta literaturo, la Enciklopedio povas esti rigardata ankaŭ kiel taŭga anstataŭanto de ĝis nun ne aperinta literatura manlibro de Esperanto.

Ĉe la lingvaj artikoloj ni klopodis je plejebla grado de objektiveco. Ĉe kelkaj artikoloj troviĝas noto kontraŭdiranta al la artikolo mem, el la plumo de alia kunlaboranto. Tiam temas pri aferoj nedeciditaj: la leganto devas mem formi al si opinion.

Pri neologismoj ni ekstreme ŝparis, eĉ vortoj »duonoficialaj« de la Plena Vortaro estas nur malofte troveblaj. Se kelkaj neoficialaj vortoj enĝlitis tie kaj tie, tio okazis nur pro preterrigardo. La vorton *Nipono* anstataŭ *Japanujo* ni uzis devigitaj de neceso: la artikolo pri Japanujo ne alvenis ĝis la fermo de la unua volumo.

La redaktoroj zorgis plej atente, ke ĉiuj detaloj estu fidindaj kaj forigis el la artikoloj ĉion, pri kies fidindeco ili havis dubojn. Estis malfacila tasko, ĉar oni ne povis kontroli la ĝustecon de ĉiuj okazintaĵoj, ciferoj kaj nomoj. Se estis eble, ni donis ĉe la fino de la artikolo fontindikon por trovi facile pli ampleksajn informojn pri la pritraktita temo.

Ĉe la aranĝo de la teksto kaj bildoj ni klopodis laŭeble, ke ĉiu materialo estu trovebla facile, sen multe da serĉado. Tion espereble multe prihelpos la detalaj indeksoj, troveblaj en la fino de la dua volumo.

Ni tre atentis ankaŭ tion, ke ni donas la verkon ne sole al homoj kun universitata klereco. Tial ni prezentas la materialon en simpla kaj facila stilo, bone komprenebla ankaŭ al komencantoj.

Ni esperas, ke la preso ĝenerale kontentigos la legantaron. Estas ja kelkaj bildoj ne sufiĉe klaraj; pri tio kulpas ne la presejo, sed tio, ke ni devis reprodukti jam origine malklarajn presaĵojn.

Kaj la malbenitaj preseraroj? Jes, malgraŭ okfoja tralego ni ne povis ekstermi ĉiujn. La liston de la plej gravaj ni donos je la fino de la dua volumo. Ĉi tie ni danku aparte s-anojn M. C. Butler kaj T. Indra pro la atentega legado kaj donitaj konsiloj.

La redaktado de tiel multpretenda verko ne estus ebla sen multaj kapablaj kunlaborantoj. Ilan liston oni legu sur aparta loko. Ĉiuj el ili meritas ne nur nian dankon, sed ankaŭ dankon de la tuta esperantistaro. En la unua vico staras: s-roj L. Bastien, G. P. de Bruin, M. C. Butler, K. Kalocsay, T. Indra, P. Tarnow kaj E. Wiesenfeld. Aparta ĝojo povas esti por ĉiu adepto de la Zamenhofa lingvo, ke en la portado, de

la brikoj al tiu ĉi granda konstruaĵo partoprenis esperantistoj el ĉiuj mond-konceptoj.

Tiu partoprenado estas necesa ankaŭ post la apero de la Enciklopedio. Ni jam diris, ke nia pleja klopodo estis: resti objektiva kaj eviti mankojn. Sed, por sukcesi pri tio, ni bezonas la laboron de ĉiu esperantisto, leganta tiun ĉi verkon. Ni ĉi tie petas ĉiun interesiganton, alsendi al ni la rimarkojn pri la verko kaj ni danke notos ĉiun kritikon, kiu donos al ni eblon por plibonigi ĝin per suplemento aŭ en eventuala dua eldono.

Ni ne povas ne paroli ĉi tie pri la eldonejo, faranta per tiu ĉi libro la plej grandan ĝisnunan eldonistan fortostreĉon en E-ujo. Tion ĝi povis riski nur kun la plej firma kredo je la forto kaj estonteco de nia movado. Kaj ni devas menciĝi ankaŭ tiun milon da entuziasmaj, literaturŝatantaj esperantistoj, kiuj je la unua voko de la eldonejo ariĝis en Asocion por helpi kaj ebligigi la eldonon de verkoj, kia estas la jena.

Enciklopedio de Esperanto kreĝis el entuziasma, sindona kunlaboro de Esperantistoj el ĉiuj tendencoj, el senlaca, kelkjara laborado de ĝiaj redaktoroj kaj el entuziasma, paciencia helpemo de multaj centoj da simplaj Esperantistoj-soldatoj. Tia laboro, la rezulto de tia laboro devas ŝveligi en nia brusto memfidon, fidelecon al movado, kiu havas malgraŭ sia juneco, tiom ampleksan pasintecon. La legado pri la laboro de niaj unuaj pioniroj, la mal-facilaĵoj de la laboro en la unuaj tempoj, la faritaj kaj atingitaj rezultoj kiujn ni povas ĝuste taksu nur post komparo de la tiama kaj nuna situacio, donas al ni forton por daŭrigi la komencitan vojon ĝis la triumfa venko.

Enciklopedio de Esperanto! Tiu titolo impresas iel scienceme kaj seke. Tamen: ĝi rakontas al ni pri suferado, batalado, penado de niaj unuaj pioniroj, pri luktoj, laciĝoj kaj reaspiroj, pri florado kaj »velkantaj folioj«, pri fideluloj kaj perfidoj, pri malvenkoj kaj triumfoj — kaj, sub la impreso de ĉio ĉi, oni sentas kvazaŭ legi grandegan epopeon: la entuziasmigan epopeon de nia movado de »esperantoj«.

Se nia fortostreĉa laboro estos, krom simpla informilo, ankaŭ entuziasmiga instigilo por neŝanceblebla fido kaj nelacigebla fervoro, tio estos la plej bela rekompenco de niaj klopodoj.

Budapest, majo 1934.

LA REDAKTOROJ

MALLONGIGOJ

- adm.** = administranto
adv. = advokato
apr. = aprilo
aŭg. = aŭgusto
aŭt. = aŭtografita
bibl. = bibliotekisto
ĉ. = ĉirkaŭ
dec. = decembro
del. = delegito
dir. = direktoro
d-ro = doktoro
d-ro fil. = doktoro en filozofio
d-ro med. = doktoro en medicino
d-ro teol. = doktoro en teologio
E = Esperanto
E' = Esperanto, gazeto de UEA
E-n = Esperanton
E-a = Esperanta
E-an = Esperantan
E-e = Esperante
E-isto = Esperantisto
EA = Esperanto-Asocio
EF = Esperanto-Federacio
EG = Esperanto-Grupo
EI = Esperanto-Instituto
EK = Esperanto-Klubo
EL = Esperanto-Ligo
ER = Esperanto-Rondo
ES = Esperanto-Societo
EU = Esperanto-Unuiĝo
ekz. = ekzemple
eld. = eldonis, eldonisto
e-roj = ekzempleroj
febr. = februaro
f-ino = fraŭlino
HDE = Heroldo de Esperanto
i. a. = inter aliaj
ICK = Int. Centra Komitato
IKUE = Int. Katolika Unuiĝo E-ista
ing. = inĝeniero
instr. = instruisto
int. = internacia
jan. = januaro
jun. = junio
jul. = julio
kas. = kasisto
k. a. = kaj aliaj
k. ĉ. = kaj ceteraj
k. s. = kaj similaj
komp. = komparu
ktp. = kaj tiel plu
l. = legu (en la fonto)
LEA = Laborista EA
lab. = laborista
LI = Lingvo Internacia
LK = Lingva Komitato, ano,
LK = Lingva Komitato, -ano,
lit. = literatura
nask. = naskiĝis
nov. = novembro
n-ro, No = numero
of. org. = oficiala organo
okt. = oktobro
OV = Originala Verkaro de Z
p. = paĝoj (laŭ nombro)
p: = paĝo(j) (laŭ ordo)
prez. = prezidanto
prof. = profesoro
proks. = proksimume
prop. = propagando
prop-isto = propagandisto
ps. = pseŭdonimo
red. = redaktis, redaktoro
s-ano = samideano
SAT = Sennacieca Asocio Tutmonda
S-ulo = Sennaciulo
SR = Sennacieca Revuo
sekr. = sekretario
sep. = septembro
s-ino = sinjorino
s-ro = sinjoro
t. e. = tio estas
t. n. = tiel nomata
trad. = tradukis, tradukisto
UEA = Universala Esperanto-Asocio
UK = Universala Kongreso de E
univ. = universitato
univ. prof. = universitata profesoro
v. = vidu (en la Enciklopedio)
vicprez. = vicprezidanto
Z = Zamenhof
Z-a = Zamenhofa
ZA = Zamenhofa Adresaro
(?) montras dubon aŭ necertecon

Rimarkoj. Por la nomoj de monatoj kaj nacioj ni uzis ĝenerale minusklaĵn komencliterojn. — Por datoj anstataŭ la longa 1-an de junio 1905 ni uzis 1 jun. 1905. — En biografioj la nomon de la nacio ni mallongigis en la teksto per majuskla komenclitero: ekz. se post la nomo de la persono ni jam notis la naciecon, de japano, J-E Vortaro signifas Japanan Esperantan

A

Aarse (arse) Simon, nederlandano. Nask. 28 dec. 1900 en A'dam. E-isto de jan. 1930. 38 kursoj, multaj paroladoj en Nederlando kaj Svedujo, traidukoj, artikoloj.

Abasidze Georgo, sovetiano, kartvelo (georgiano), pedagogo. Nask. 1873. Energia propagandisto kaj instruisto de E en Transkaukazio. En 1931 A. atingis gravan sukceson por E en Intersindikata Konsilantaro en Tiflis. Sekr. de Kartvelia komitato de SEU.

Abesgus M., ruso, bankoficisto, komence en Baku, poste en Teheran, kie li estis unua pioniro de E. Alia plumo apartenas belaj originalaj skizoj pri Baku en 'LI' kaj originala rakonto Kraljevič Marko premiita en la lit. konkurso de 1896.

Abismoj. Romano originale de Jean Forge. 1923, 150 p. »La kerno de la romano estas ĉiutage ripetiganta historio, sed F. povis per sia majstra plumo igi ĝin interesa ĝis la fina vorto... Frapante klara stilo, populare profunda psikologio kaj absoluta fundamenteco.« (Jobo, 'LM' 1923, p: 140.)

Aborta Rimo. v. Rimo.

Abstinenculoj, v. Senalkohola kulturo.

Ada, ps. de A. D. Atanasov, v.

Adam Eugeno, v. Lanti.

Adam Z., ps. de A. Zakrzewski (v.).

Adams (admz) Alfred John, anglo. Nask. 30 marto 1846, mortis 3 marto 1930 en Hastings. Ĉestis la UK-ojn 1905—14. Fondis la grupon en Hastings. Vigle kaj malavare subtenis la blindulan E movadon.

Adams William George, usonano,

daktiloskopiisto. Nask. 21 apr. 1886 en San Jose (California). E-isto de 1903. Kunfondinto de EG en Seattle (Washington) 1906, kaj sek. 1906—08. Subred. de gazeto Amerika E-isto 1908—09. Ĝintinta LK. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Adamson Einar, (ps. Eran; E-r A-n), svedo, redaktoro. Nask. 4 majo 1894 en Mora, Agis en la lab. movado, 1916—30; traveturis la tutan landon per paroladoj. De 1930 eldonas sendependan kulturalan semajngazeton »Minaretan«, kiu enhavas regule artikolojn pri E. Jam en 1913 eldonis la hektografitan gazeton La folio, en 1914 la presitan La espero. Faris paroladojn pri E en proks. 300 lokoj, fondis 30 E-grupojn, gvidis kursojn en multaj lokoj. Kunfondis SLEA en 1922 kaj ĝian gazeton; estis prez. kaj red. ĝis 1930. Organizis la 8-an SAT-kongreson en Göteborg 1928. Nun prez. de EK en Göteborg. Verkis prop. librojn 1915, 17, 18, 20, 24, Lernolibron por-maristoj, 1926, alian lernolibron, 1928, adresaron de svedaj E-istoj, 1928. kompilis Kongres-Albumon pri la 8-a SAT-kongreso, verkis du interesajn verkojn pri la nova Ruslando: Studvojaĝo en Sovet-Rusio, 1926, kaj Subruĝaj standardoj, 1928.

Adamson Hendrik, estono, instruisto. Nask. 24 sept. 1891. Estona poeto kaj verkisto kun intime elegia humoro, granda reaga sentemo al la krudeco de l'vivrealajo. Ekde 1932 li verkas poemojn ankaŭ en E. Liaj poemoj aperis plejparte en L.M. Li verkas recenzojn en la estonaj Informoj.

Adasismo. Tiel nomis Grabowski rimadon per la samaj gramatikaj

elementoj (adas-adas, ema-ema, ita-ita). v. Rimo.

Adelsköld (adelsöld) Claes A., svedo, majoro en la voj- kaj akvokonstrua korpuso. Nask. 7 sept. 1824, mortis 1 okt. 1907 en Stockholm. Unua eminentulo favoranta E-n en S., per malavara monhelpo al la Upsala klubo por eldoni lernolibron, per simpatia deklaro pri E, 1896. Unua komponis muzikon al La Espero (1891).

Adresaroj. La plej utilaj helpiloj por la praktika uzo de E, kiuj havas gravan signifon ĝis la ĝenerala akcepto de E. Ili ebligas la orientiĝon de la E-istoj, bezonantaj ĉu informojn aŭ konstantajn rilatojn, ĉu helpon aŭ amikan rondon dum eksterlanda vojaĝo. La unua adresaro estis la Adresaro de E-istoj (v.). Jam en la antaŭmilitaj jaroj kaj precipe post la milito int. E-societoj eldonis la nomaron de sia membraro. UEA jaro post jaro aperigas en sia jarlibro la adresaron de siaj delegitoj, kaj tiu ĉi Jarlibro estas la plej grava inter la nun ekzistantaj. Ankaŭ SAT, TAGE, IKUE kaj aliaj societoj eldonis diversajn jarlibrojn aŭ simplajn adresarojn. Rimarkindaj adresaroj estas ankoraŭ la BES-a Adresaro (v.) kaj la Adresaro de Polaj E-istoj (v.). Estas multaj adresoj troveblaj, ĉefe tiuj de korespondemuloj, en HDE, 'E' La Praktiko kaj en aliaj gazetoj.

Adresaro de Esperantistoj. La unua serio enhavanta unuan milon da E-istoj estis eldonita de Z en 1889. 39 p. Ĝi entenis adresojn de tiuj personoj, kiuj leginte la unuan broŝuron de Z, sendis al Z la desireblan folion el la broŝuro. (v. Promeŝoj.) El tiu ĉi unua aro poste multaj farigis fervoraj E-istoj. La pluaj serioj aperis de tempo al tempo en La E-isto aŭ en apartaj broŝuroj. La serioj de 1904 ĝis 1909 estis eldonataj de Hachette, kompilataj de Ménil. La broŝuroj entenis krom listo de novaj E-istoj ŝanĝitajn adresojn, ripetitajn adresojn, alfabetan registron de la nomoj, kiuj sin trovis en la broŝuroj, kaj nomaron de E literatura kaj gazetaro.

»Kuna sumo de la enskribitoj kreskis jene, 1889 : 1000, 1896 : 4000,

1903 : 7700, 1905 : 11000, 1906 : 13000, 1907 : 16000, 1908 : 19000, 1909 : 22000. (BIL' p. 437.) I. SIRJAEV.

Adreslibro de Pollandaj Esperantistoj. Prilaboris Z a w a d a. 1931, 208 p. Kun 4000 nomoj, troveblaj ankaŭ laŭ fakoj kaj inklinoj.

AEA: Aŭstria E-Asocio, v. Aŭstrujo.
AED: Aŭstria E-Delegitaro, v. Aŭstrujo.

AEALA: Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj, fondita de Literatura Mondo. Celo: doni belajn, bonajn kaj malkarajn librojn al la membroj de la Asocio. Fondjaro 1933. Membronombro en la unua jaro 960. Kotizo sv. fr. 13.50 por frualigintoj kaj 17.— por ceteraj plus sendkostoj. La membroj ricevis en 1933. ses librojn kun 1800 paĝoj, inter ili ankaŭ Enciklopedio de Esperanto; en 1934 10 librojn kun 2400 paĝoj. Per tiu sistemo la prezo de la donataj libroj triobligis. v. Literatura Mondo.

Aelita aŭ la Marso formortanta. Romano de Alekseo Tolstoj, el la rusa trad. de L. Pil 1928, 200 p. »La vigla fantazio de la eminenta verkisto venkas la spacon, la tempon kaj flugigas nin per sia raketa aerŝipo sur la Marson. La stilo estas senproĉa.« (Jobo, Hungara Heroldo, 1929, A. 2.)

Afriko, v. Alĝerio, Egiptujo, Etiopio, Kanarioj, Madagaskaro, Madeiro, Maroko, Sudano, Sudafriko, Tunizio.

Agache (agaŝ), Alfred, franco, urbarkitekto. Nask. 24 febr. 1875 en Tours. Efektivigas artan plivastigon de urboj: Dunkerque, Rio de Janeiro, k. a. Faris prelegojn kaj verkojn pri tiu temo. Faris multajn paroladojn pri E en diversaj landoj, precipe en Brazilo.

Aglutina karaktero de E. Aglutini: formi vortojn, kunmetante memstarajn vorterojn, kiuj konservas ĉie sian propran signifon. (Plena Vortaro).

»Kiel en la lingva grupo nomata finna aŭ uralo-altaja, vorteroj senŝanĝe preskaŭ kaj meĥanike aliĝas aŭ pli bone agluigias unu al alia, tute neŝanĝinte siajn formojn, tiel ankaŭ en nia racia E, pura tipo de aglutina lingvo, apartaj elementoj de vortoj, gluiĝante, formas tutan vorton. Pro tia principo de algluado, kiun nenia alia

lingvo tiel plene posedas, E fariĝas tre simpla, facila kaj multe pli riĉa ol iu ajn natura lingvo. Ekz. la vorto »pralingvo« formiĝas el tri apartaj vorteroj: »pra« (prefikso), »lingv« (radiko), kaj »o« (sufikso). Tiuj ĉi vorteroj, gluiĝinte formis novan vorton, tute ne perdinte memstaran signifon kaj neion aliformiĝinte. Oni ne povas diri tion saman pri la procedo, kiun sekvas en la vortkonstruo la Hindu-Eŭropaj lingvoj. En ili la vorteroj, formante novajn vortojn, ŝanĝiĝas kaj perdas sian memstaran signifon. La vorteroj ne gluiĝas en ili, sed alfondiĝas, por tiel diri, unu al alia, aliformiĝante kaj ricevante novajn ecojn de la fandaĵoj.»

v. Ekstereŭropa karaktero de la E-a morfologio.

STAMATIADIS.

NOVA GRAM. LIBRO.

Agoriĉ A., serbo, oficisto de ŝtatkontrollejo, nun en Niŝ. Verkis en 1925 lernolibron kaj red. litografitan gazeton *Antaŭen*.

Agourtine (agurtin), Léon, franco, ĵurnalisto. Nask. 27 apr. 1895 en Bialystok (Polujo). E-iĝis en 1911. Faris prop. broŝurojn en rusa kaj franca lingvoj. De 1922 sekr. de la gazetara Komisiono de SFPE.

Agren (ogren) Arvid, svedo, telefonriparisto en Eskilstuna. Nask. 25 jun. 1887 en Västmanland. E-isto de 1906. Kunfondinto de Klubo E-ista de la laboristoj en Stockholm. Prop. kaj kursgvidado.

Aguilár Blanch (agvilár blanĉ) José, hispano, urba konsilanto, okulkuracisto, mortis. Prez. de la Valencia Grupo. Estis amiko de Z.

Aguilo Valenti Juan, hispano, d-ro jurista; estis vicurbestro de Palma. Nask. 22 jun. 1884 en Palma, Balears. Kunfondinto kaj sekr. de EK Palma.

Ahlberg (alberg) Per, svedo. Nask. 21 nov. 1864 en Vestergoetland. Unu el la unuaj svedaj E-istoj, agema propagandisto ĝis la Ido-skismo. De 1908 propagandis Ido-n, de 1928 Novial-on.

Ahnfeldt (anfelt) Fritiof, svedo, popollerneja instruisto. Nask. 9 majo 1888 en Tving. E-isto de 1921. Del. de UEA de 1923. Prez. de distrikta unuigo E-a. Faris prelegojn pri E, ankaŭ en radio; aranĝis prelegvojaĝ-

ojn por eksterlandaj prop-istoj kaj interpretis tiujn, ktp.

Aibara Susumu, japano, oficisto de Tokia Filio de la Sekr-ejo de Ligo de Nacioj. Nask. 14 jul. 1900 en Kanazawa-si, mortis 20 dec. 1931 en Tokyo-si. En 1921 fondis E grupon en Keio Universitato kaj prezentis al la Univ. kursofinan tezon pri Bahaa Movado kun resumo en E. Konsilanto de JEL. Multe verkis por japanoj artikolojn pri Hungarujo. Estis honora membro de Hungara Turana Asocio.

Aisberg Eugéne (ps. Glacimonto; Sam O'var), ruso, ing. Nask. 10 sept. 1905 en Odessa. Cefred. de fakaj revuoj pri radio kaj televido. Loĝas en Paris de 1925. Verkis multajn teknikajn kaj popularajn librojn. Fondis la unuan eŭropan revuon pri televido kaj la francan Asocion de Televido. Dir. de la franca radiofako de la Int. Instituto de mikrofonaj studoj. E-iĝis 1919. Faris multajn prelegojn, gvidadis kursojn, organizis ekspoziciojn. En 1925 fondis kun Corret la Int. Radio-Revuo (14 numeroj) *La Babiladoj pri Radio*, kiujn li verkis por tiu revuo, estis poste eldonitaj en 13 lingvoj.

Aiza Roman, hispano, staba kolonelo. Mortis. Dua prez. de Hispana Societo por prop. de E. Kunfond. de Grupo Valencia, 1903.

Aiziere (ezjer) Jules, franco, instruisto. Mortpafita dum la mondmilito. Sekr. de la Int. Asocio de Instruistoj. Prez. de la Unuigo de la Federacioj, kiu kunfandiĝis kun SFPE, 1910. Ĝen. sekr. de SFPE, 1912—14.

Aizpuritis Aleksandrs, latvo, gimnazia dir., antaŭ la mondmilito instruisto ĉe Moskva Instituto de E. UEA-del. de 1922. Verkis int. krestomatieton kun laŭartikola vortaro en latva kaj 5 aliaj lingvoj, 1912.

Ajayi (aĝaji) Kola, (kristana antaŭnomo: Nathaniel), yoruba-negro, angla ŝtatan, aktoro, E-a prelegisto. Nask. 23 apr. 1906 en Warri, (Nigeria). Restadis longe en Usono. E-istiĝis 1931 en Bydgoszcz. (Fratoj Fethke.) Depost 1932 prelegas en E pri Afriko antaŭ ne-E-ista publiko. Li havis en Polujo 45 prelegojn en 22 urboj antaŭ 8100 personoj, radio-

kantadon; en Ĉeĥoslovakujo 33 prelegojn en 21 urboj antaŭ 12.0) p. (apr.-majo 1933), du radioprezentadojn; en Jugoslavujo ĉ. 25 prelegojn (jun.-sept 1933).

Akademio, la supera komisiono de la Lingva Komitato (v.).

Akbar. Romano de Van Limburg Brouwer, trad. el la hollandaj J. C. kaj J. R. G. Isbrücker kaj J. Ziermans, 1923, 256 p. Orienta atmosfero, homarama tendenco, senriproĉa stilo.

Akita Tokuzo (ps. Akita-Ujaku), japano, verkisto, socialisto. Nask. 1883 en Aomori-ken. Studis anglan literaturon en Waseda Universitato. Vizitis Sovetan Rusi'on 1927. E-isto de 1913. Gvidanto de J proleta E movado. Liajn dramojn junuloj tradukis: *Danco de Skeletoj*, 1927.

AKLE: Aŭstria Katolika Ligo E-ista v. Aŭstrujo.

Aktarĝiev Georgi, bulgario, ĵurnalististo korespondanto de Wolff-agentejo; antaŭe ŝtata oficisto. Nask. 18 okt. 1868 en Tirnovo, loĝis en Sofia, mortis 30 jul. 1933 en Sofia. Unu el la plej malnovaj kaj aŭtoritataj E-istaj en B. E-isto de 1898. En 1904 redaktis la kvaran jarkolekton de *Rondiranto*. Gvidis kursojn, faris paroladojn. Estis prez. de BEA 1910—12, 1920—27 (BES), kaj ankaŭ post 1930 ĝis la morto.

Aktuaroj (a-ekur-matematikistoj). La int. organizo de la aktuaroj plurfoje okupis sin pri E kaj en 1931 aperis faka vortareto en E, angla, franca kaj germana lingvoj.

Akuzativo kun infinitivo. En ĉi tiu frazkonstruo apud la rekta komplemento staras infinitivo, kiu signas la agon de P rekta komplemento. En E la AKI estas uzata nur post la verboj de perceptado (vidi, aŭdi, senti); ekz: mi vidis lin fali; mi aŭdis lin paroli, ktp. Ĉi tiu formo propre ne estas «klasika», tamen, mem Z rekte konsilas ĝin anstataŭ la peza predikata adjektivo: mi vidis lin fantanta; mi aŭdis lin parolanta.

Ĉe aliaj verboj AKI ŝajnas kontraŭa al la E-a lingvospirito. Do frazoj, kiel ekz: mi esperas lin veni; mi kredas lin sukcesi; ŝajnas evitindaj.

KALOCSAY.

Albagés Ventura (albañes') Josep, kataluno, instr., red. de pedagogiaj revuoj. Nask. 25 dec. 1877 en Vimbodi. E-isto de 1907. Fond. de EG-j en Vic, Manresa, kursgvidanto de post sia E-igo. Premiito de Int. Floraj Ludoj, organizinto de KEF-kongreso en Manresa.

Albanujo. La unua E-isto estis Lazar Shantja en Skutari (Shkodra) en 1913. (v. 'E' 1914, p: 22—23.) Unua lernolibro aperis en 1928. E-lingva verko pri Skanderbeg estis eldonita en 1929, 144 p., ĝin kompilis Cuk Simoni. Laŭ la statistiko de Dietterle en la lando troviĝis nur 6 E-istoj. En 1933 UEA-del. nur en Skutari. En la raporto de la Ligo de la Nacioj estas legeble, ke la albana registaro en 1922 enkondukis devigan instruadon de E en la duagrada lernejoj, sed tiu detalo ŝajnas esti eraro aŭ mistifikio.

Alberda Jouke, nederlandano, polistico. Nask. 11 julio 1885 en Rauwerderhem, Frislando. Ampleksa socia kaj faka agado. Prez. de la EG Verda Stelo en Nymegen, landa delegito de Int. Polica Ligo.

Alberich Jofre (alberic hofre) Sebastia, kataluno, agenteo de transportoj. Nask. 7 jul. 1897 en Barcelona. E-isto de 1911, prez. kaj eks-sekr. de KEF, sekr. de Int. Floraj Ludoj. Sub la ps. Saljo verkis kelkajn originalajn rakontojn kaj skribis multajn tradukojn kaj recenzojn por *Kataluna E-isto*.

Albumo de konataj E-istoj. Red. Fritz Schuck. 1906. 55 p. kun 111 fotoj. Unika dokumento pri la pioniroj de la unua epoko de E.

Aldono al la Dua Libro de P lingvo int. estas broŝuro (19 p.) e-doniĝa de Z en 1888 anstataŭ promesitaj ses kajeroj. Z anoncas la decidon de la Amerika Filozofia Societo (v.), kiu proponis aranĝi int. kongreson. Z esperis, ke »la tuta sorto de P lingvo int. transiros en la manojn de P kongreso,« kio tamen ne efektiviĝis. Sed estante singarda, Z atentigis, ke »ĉiuj diligente laboru laŭ la vojo jam unu fojon montrita.« (I. Privat, I. p: 38—42. — La tuta teksto en OV, p: 29—40.)

I. SIRJAEV.

Aldridge G., pastro. Nask. en 1854. mortis 12 okt. 1926 en Aukland. Unu el la plej fruaj pioniroj de E en Novzlando, kie kunfondis la unuan ES-n, kies prez. estis multajn jarojn. Antaŭmilitite instruis E-n al pli ol 200 p.

Alegorioj el la naturo. De Gatty, el la angla trad. Gego. Dua eld. 1922, 66 p. »Ĝia ĉarmo ravas la animon de ĉiu meditante homo. Stilo elegante fundamenta.« (Jobo, L M. 1923, p: 119.)

Alessio Alberto, italo, d-ro pri pura matematiko, admiralo ĉe la marino. Nask. 19 nov. 1872 en Venecia regiono. Verkis multajn sciencajn librojn pri navigado, partoprenis sciencan ekspedicion en Karakorum. Post la milito multe laboris por E, ĉefe per artikoloj. Reprezentis italan ministerion ĉe la UK en 1920.

Al Eterna Paco. Filozofia traktajo de Kant, el la germana trad. P. Christaller. 1924, 88 p. »La penso de P' geniulo en tiu lia verko mirinde kuniĝas kun la interna ideo de nia movado. Inda traduko« (G. S., E., 1924, p: 125.)

Alexander Frederick William, anglo, kuracisto. Nask. 16 febr. 1859 en London. Dum 45 jaroj konata sanitaristo en orienta London. E-istiĝis en 1913 Verkis por Ondo de E, k. a.

Alfus Jozefo, (ps. Alf.), polo, librotentisto. Nask. 9 dec. 1892. Sekr. de PED. Kas. dum la UK en Krakovo, 1931. Artikoloj en Pola E-isto, E-ista Voĉo, HDE.

Algerio. (Afriko). La unuaj E-istoj estis en 1899 P. Decor (ankaŭ laŭ UEA-1928) en Alger; A. Rivier kaj kapitano A. Capé-Montrosier. La lasta komencis en 1903 neordinare vigan propagandon per artikoloj kaj paroloj. Kune kun H. Tarry li fondis E grupon, kiu dum ses semajnoj varbis 122 anojn, inter ili la prefekton kaj urbestron de Alger kaj aliajn altrangulojn; la grupo 8 marto 1904 jam havis 283 anojn. Ili publikis tutan vicon da prop. artikoloj en »La Nouvelliste d'Alger«, »Les Nouvelles«, »La Dépêche Algérienne« kaj »Vigie Alg.« Dank' al la gazetaro E estis tre favore rigardata en la lan-

do, ĉe en Tunizio. En la plua laboro helpis al li Lemaire en Batna kaj Henri en Oran. Laŭ speciala peto de la kapitano, la milita ministro de Francujo permesis al oficioj anigi en E grupoj. En 1904 la kapitano entreprenis prop. vojaĝon tra la lando: paroladoj kaj ekinteresiĝo ĉe de itaj kaj hispanaj kolonianoj. Dume la grupo kreis prop. gazeton »Turco-Revue« kaj ellaboris bonan prop. broŝuron. En 1905 venis en Setifa la itala E-isto grafo Gallois kaj eklaboris tie por E. En 1905 Capé-Montrosier devis reiri Francujon, la prez. de la grupo fariĝis Bresson. En apr. 1905 okazis granda E-ekspozicio en Alger, kiun dum tri tagoj vizitis kelkaj miloj. En 1906 aperis E grupo en Caen (prop. Lespesquer) kaj laborista grupo en Alger, kiu interrilatis kun anglaj laboristoj pri fondo de gazeto, kiu defendus la int. interesojn de la proletaro. Poste tiu vigla movado ruiĝis. Laŭ la statistiko de Dietterle en 1928, E-istoj troviĝis en 5 urboj. Laŭ la ICK-raporto 1931 en A. loĝas izolaj s-anoj, sed ilia helpo estas ofte dumtempa; estante koloni-oficistoj ili ofte forlasas la landon post unu jaro. Indiĝenoj, kiuj lernis E-n, pro politika orientado preferis aliĝi al SAT. Dum kelkaj jaroj klopodis por E ankaŭ en oficialaj rondoj s-ino Tiard el Paris. En 1933 UEA-del. estis en Alger (ankaŭ ES), Constantine, Philippeville kaj Sétif. I. SIRJAEV.

Aline. Rakonto de C. F. Ramuz, trad. Saussure. 1911, 138 p. »Elegantu traduko de bone elektita verko... Verdo de la personoj... akurateco de la naturaj priskriboj.« (La Revuo, 1911—12, p: 194.) »La traduko... preskaŭ ĉiam plaĉas. Tamen ĝi kelkfoje haltigas la leganton per novaj formoj aŭ uzo de teknika vortotute senutila en netehnika verko.« (Noel, LP 1919, p: 442.) »Modela stilo.« (BIL, p: 361.)

Alings Hendrik Walter, nederlandano, bankoficisto. Nask. 28 okt. 1895 en Amsterdam. E-isto de 1926—27. Tuj eklaboris por E, iĝante sekr. de grupo kaj poste estrarano de Fed. de Lab. E-istoj. Red. de ties organo Lab. E-isto. Kunlaboris por Holanda E-isto. Prop. artikoloj.

Al la fratoj. Poemo de Z, kiu unue aperis en 1889 en La E-isto. »Per tiu poemo, kvazaŭ tra kristalo travidebla, ni povas rigardi ĝis fundo de lia koro, kiel ĝi batis en vespera silento pensante al la vasta rondo familia.« (Privat, Vivo de Z, p: 43.)

ALLE: Aŭstria Laborista Ligo E-ista, v. Aŭstrujo.

Allum J., norvego; menciita en Hist. de E de Zakrzewski kiel pioniro en N, kaj en Privat: Hist. de E, II. p: 33 kiel LK-ano. Lia nomo kaj laboro kiel E-isto estas tute nekonata al samtempaj E-istoj, certe pro tio, ke li vivis izolule.

Almeida Martins d' Bernardino (ps. Luzo Bemaldo), portugalo, librotenisto. Nask. 27 jul. 1891 en Lisboa. Aktivulo en la pacifista movado. Unuaranga propagandisto jam helpe al la svisa pioniro Horner. Rimedoj: paroladoj, lecionoj, artikoloj, verkoj poeziaj kaj prozaj. Tereno: Lisboa EG, LES, PEA, kiun li prezidas, la gazeto P E, kies direktoro li estis. Gramatiko kunlabore kun Carreira.

Alomar Serragut Gabriel, hispano, elektra ing. Nask. 8 jun. 1885 en Palma, Balears. Agado en la liberala partio kaj en la Ruĝa Kruco. E-isto de 1905. Kunfond. (1907) kaj ĉ. 10 jarojn prez. de EK Palma. Kursoj en la Nacia Instituto de Balears.

Alonso Sanz Vicente, hispano, vic-kolonelo de la vagonara korpuso, nun en pens. Nask. 19 jul. 1863 en Albendiego. E-isto de 1907, laboris unue en Burgos, post 1911 en Madrid. Estis prez. de HEA, 1927—29 kaj de la Centra Madrida EG, 1920—27. Paroladoj, kursoj, artikoloj. UEA-ano de ĝia fondo.

Altenburger Adolf, hungaro, estis mezlerneja prof. en Szeged. En 1906 verkis prop-ilon kun gramatiketo (60 p.) kaj en 1910 gramatikon.

Al Toronto. Novelo originale verkita de St. EnghoIm. 1930, 93 p. »Toronto estas la urbo de la junecaj revoj, poste la ripozejo de laca viro. Ĉirkaŭ tiun ĉi simbolan signifon havanta urbeto fluas trankvile, tamen dolore, la simpla, sed problemlena historio, kies aŭtoro elokvente, arte kaj kuraĝe pravas sian talenton. La

stilo estas tre bela, kelkloke ĝi estas surprize eleganta kaj sprita.« (Silabo, Hungara Heroldo, 1930, n-ro 5.)

Amades Gelats (ĥelats) Joan, kataluno, publicisto kaj folkloristo. Nask. 23 jul. 1890 en Barcelona. Verkoj pri folkloro kaj popoldanco. E-isto de 1907, fond. kaj prez. de KEF, de la loka EG, kunorganizinto de la 5a UK. Eldonis mliojn da diversaj, artaj E-aj sigelmorkoj kun 243 diversaj bildoj.

Amaj Poemoj. Deko da originalaj versaĵoj kaj ok verstradukoj de J. Grau Casas. 1924, 32 p. »Agrabla melodio lulanta per amaj revoj kaj rememoroj. Tute korekte kaj ofte lerte verkitaj.« (G. S., 'E' 1924, p: 124.)

Amal Stelaro. Tradukaĵoj kaj originalaĵoj de La Forĝesito, 1922, 119 p. »Interesa kolekto kun tre diversa enhavo; du unuaktaj komedioj, humoraj aŭ dramaj rakontoj, amaj poezioj. La ĉefa parto estas tradukaĵoj el portugala lingvo.« (G. S., 'E', 1922, p: 92.)

Amerika Eseprantisto. Organo de EANA, fondita en 1906; formato 26x18. Redaktis: A. Baker kaj Ivy Kellermann; J. J. Süßmuth en 1933.

Amerika Filozofia Societo. Fondita en 1743 de Franklin kaj aliaj amerikaj sciencistoj por favori la sciencojn kaj helpi enkonduki utilajn eltrovaĵojn. En 1887 AFS elektis komitaton por ekzameni la sciencan valoron de Volapük. La komitato, sciante nenion pri E, kondamnis Volapükon kaj konstatis la verajn principojn, sur kiuj la L. I. devas esti bazita, tute similajn al la principoj de E. La Societo dissendis al ĉiuj klerulaj societoj de la mondo proponon pri int. kongreso por starigi L. I. laŭ tiuj principoj. Z informite pri la proponita kongreso, en sia »Aldono al la dua libro« anoncis intencon lasi la decidon pri la eventuala formo de la L. I. kaj la kontrolon de ĝia sorto al tiu kongreso. Tamen pro nesufiĉa respondo al la alvoko de la AFS la kongreso ne okazis. Henry Phillips, sekr. de la Societo fariĝis varma amiko de E kaj tradukis la unuan libron de Z. W. G. ADAMS.

Ameriko. v. Argentino, Bolivio, Brazilo, Ekvadoro, Ĉilo, Gvatemalo, Honduraso, Kanado, Kolombio, Kostariko, Kubo, Meksiko, Paragvajo, Peruo, Salvadoro, Urugvajo, Usono, Venezuelo.

Amfitriono. Komedio de Molière, el la franca trad. E. Legrand. 1922, 126 p. Laŭ la antaŭparolo la traduko estis verkata kiel ekzercado apenaŭ du monatojn post la tago, kiam la tradukinto eklernis E-n. Tamen la traduko estas »tute korrekta, tre facile komprenebla.« (E⁷ 1923, p: 27.)

Amo estas pli forta ol morto. Tragedio en kvin aktoj de Janis Rainis, el la latva trad. Ints Čače. 1933, XVI kaj 111 p. »Lit. prilaboro kaj dokumente pruvita okazintaĵo el la 17-a jarcento... senfina kaj ideala amo de Maija.« (G. Eckelmann, HDE, 1933, n-ro 39.)

Amo kaj Poezio. Originalaj poemoj de Jan van Schoor. 1928, 95 p. »Iom malnovmodaj, sed tamen freŝaj, facilaj, amindaj sonoj de sentanta homa koro, kiuj ofte montriĝas en lerte kunmetitaj rimoj kaj naive karesas la orelojn. S. apartenas al la malmultaj, kiuj ne nur provas, sed ankaŭ povas pensi kaj poemi en E.« (Hungara Heroldo, okt. 1928.)

Amon Otto, hungaro, ĵurnalisto, poŝtifikisto, instr. de stenografio. Nask. en 1879, mortis 8 aŭg. 1921. Aktiva pacifisto. Poeto. Li estis iniciatinto de la E-movado en Transilvanio (antaŭe en Hung., nun en Rum.), fondis klubon en Kolozsvár (Cluj), kies sekr. li estis. Ĉeestis la unuan kaj poste multajn aliajn UK.

Amsterdam. Ĉefurbo de Nederlando; 749.459 loĝantoj. 11-a kongreso de SAT, 2-7 aŭg. 1931, ĉ. 400 partoprenantoj el 14 landoj. Komunista opozicio sensukcese klopodas akiri la gvidadon de SAT. Skismo. Opozicio forlasas la kongreson. SAT restos nepartieca. BRUIN.

Analiza Historio de la Esperanto-Movado. Verkis E. Drezén. 1931, 96 p. »Kritika verko, kiu analizas la E movadon ne kiel apartan movadon, sed kune kun la aliaj socialaj movadoj kaj malkovras la interrilatojn kun la nuntempa sociordo,

mondmilito, kaj postmilitaj novaj socialaj tendencoj.« (Parvus Piscis, L. M. p: 180.) (V. »Konsisto de la E-istaro«.)

Andersen Axel, dano, pentristo. Nask. 10 okt. 1886 en Svendborg. E-isto de 1919. Gvidis multajn kursojn en Odense kaj en aliaj urboj. Sekr. de CDEL.

Anderson (andersn) Euphemia, skotino, instruistino. Nask. 1 aŭg. 1882 en Rattray. Prez. de Skota EF, 1929-30.

Anderson (andersn) John, skoto, pastro. Mortis 27 marto 1922, 101 jara. Li komencis lerni E-n 85-jara, kaj restis entuziasma ĝis sia morto: la plej aĝa E-isto en la mondo.

Andersson Erik Emanuel (ps. Emanuello de Andero), svedo, pentristmastro de fervojaj kompanioj. Nask. 31 marto 1896 en Malmö. Konatiĝis kun E per korespondo kun militkaptivo en 1916. Sekr. kaj depost 1927 prez. de EK en Malmö. Fondis E hejmon de Malmö kaj E distrikton de provinco Skane. Pli ol 25 kursoj, 2 radioparoladoj. Tradukis E-en Datoj kaj Faktoj pri la porpaca movado de Nilsson, 1928, La Lakta Vojo de Topelius, 1924, kelkajn komedietojn; faris muzikon al du poemoj de Z.

Andonoviĉ Drag., serbo, inĝ., univ. prof. ĉe teknika fakultato en Beograd. Fondis kaj red. en 1910 la gazeton Serba E-isto, estis prez. de SES en Beograd dum 1909.

Andrejev Andrej Petroviĉ, sovetiano, ruso. Nask. 24 aŭg. 1864 en gubernio de Poltava (Ukrainlando) en familio de arbaroficisto. Oficis kiel militjuĝisto en Kaŭkazio, Varsovio, Moskvo. E-istiĝis en 1910. En 1913 verkis originalan 168-paĝan rusingvan libron. (»riĉaj kaj tre lerte kunmetitaj informoj« laŭ Z.) Post la revolucio A. okupiĝis kun ofere ekskluzive pri la lingvaj problemoj kaj atingis en tiu rilato gravajn rezultojn. Li estis unu el la unuaj popularigantoj de la jafetida lingvoteorio, ĝian ĝeneralan eksponon kaj rilaton al E li prezentis en broŝuro Revolucio en la lingvoscienco, 1929. Samjare aperis (ruslingve) lia provo de pli profunda lingves-



ploro sur bazo de materialisma dial-ektiko: Lingvo kaj pensado. Lastatempe A. multe laboris super metodologio de marksisma lingvistiko, revolucia rekonstruo de la rusa lingvo, ties ortografio, gramatiko ktp. LK de 1930.

Anekdotaro. Studo per rido. De Dreher. 1931, 64 p. Uzebla kiel lernilo por progesa kurso. Lingvaj klarigoj kaj vorttradukoj en franca, germana, pola kaj angla lingvoj.

Anglada José, hispano, komerc-oficisto. Nask. 29 apr. 1893 en Barcelona. E-isto de 1908. Del. de USE-Movado, membro de HEI, sekr. de la ZI. Direktoro de Kataluna E-isto. Skribis gramatikon, kompilis vortaron.

Anglic. Nomo de ortografia sistemo de la angla lingvo, verkita de R. E. Zachrisson, prof. de la Upsala Univ. Precipe en Anglujo kaj Svedujo estis (kaj estas) farata vasta prop. por tiu ĉi ortografie pliimpligita angla lingvo kaj principe kontraŭstarigata al E. La sistemo, laŭ sia esenco, tute ne povas esperi sukceson. Dum la lastaj 40 jaroj aperis entute 7 similaj projektoj de reformado de la angla lingvo, kaj ĉiujn ilin trafis la sama sorto: la forgeso. Vere, la angloj povus akcepti reformon de sia lingvo konforme al ĝia fonetiko, sed ankaŭ por ili tio estus tre peniga afero, ĉar ja dum certa periodo paralele kunekzistis du literaturoj kun du manieroj de skribado. Sed por ne-angloj eĉ la ortografie simpligita Anglic restos tamen »tro angla«, ne sufiĉe int., kaj precipe ĝi malplaĉos pro sia ortografio, akomodita al angla prononco, — kripligante eĉ plej konatajn int. terminojn: ekz. »internashunal« anstataŭ internacia!, »asoesiaeshol« anstataŭ asociaĵo ktp.

Anglujo, v. Britujo.

Anni kaj Montmartre. Romaneto de R. Schwartz. 1930, 128 p. »Malgaja aventuro de l' juna germanino, delogita, trompita, forlasata en Parizo... estas rakontata tiel sprite, tiel moke, per tiaj neatendiaj figuroj kaj komparoj, ke ĝi elvekas nevenkeblan emocion.« (G. S., E, 1930, p. 136.)

Ano de l' ringludo. De Simonoviĉ, el la kroata trad. F. Janjiĉ, 1926, 86 p. »Romaneto kun kavalir-

eca karaktero. Duobla amo de patro kaj filo al la sama junulino.« (G. S., E, 1926, p. 209.)

Anstataŭa Edzino, romano de aŭstralia verkistino E. Maxwell, trad. el la angla M. Sampson, 1931, 212 p. »Ĝi tuj komenciĝas per edziĝo, sed fiktiva, kaj deĉe finiĝas per edziĝo, ĉi tiu reala kaj feliĉa. E ludas rolon en la romano. Bona lingvo.« (G. S. E, 1931, p. 97.)

Antaŭen E-istoj. Se oni ne kalkulas la folieton El E aperinta ununumere en Valparaiso en majo 1901, AE estis la unua E gazeto en Sudameriko kaj ĝis hodiaŭ la so.a, kiu tiel longe (13 jarojn) kaj tute regue aperis. La unua n-ro ebris en julio 1903 kaj ĝi finiĝis versajne en 1916. Paperformato 23—25×16—17 (presformaĵo ĉiam la sama) IV—12—20 p. Ĝi enhavis propagandon, en- kaj eksterlandan kronikon, bibliografion, literaturon, lingvajn demandojn ktp. P. TARNOW.

Antaŭen kun kredo. Literatura jarlibro de Pola E-isto por 1911. 203 p. »Interea, bela, bonstila libro. La nomoj de Kabe, Grabowski, k. a. atestas jam pri pura E-a stilo.« (M. Sidl., Ondo de E, 1912, p. 106.)

Antologioj en E. La A-oj en E celas konigi per reprezentaj pecoj la literaturon de unuopaj nacioj, precipe de la malgrandaj. Ĉi-rilate ili estas tre gravaj parte per la akcelo de la E-a kulturo, kiu ja sinteziĝas el la diversaj kulturoj naciaj, parte el la vidpunkto de propagando: montrante la eblojn, kiujn E prezentas al siaj adeptoj por intelekta plezuro kaj riĉiĝo, kaj al ĉiuj nacioj por la konatigo de siaj kulturtrezoroj. La unua A. estis la Pola Antologio de Kabe (1905), ankoraŭ eta ĝermo. Vastaj A-oj, redaktitaj laŭ la supre skizitaj vidpunktoj, aperis en la lasta tempo: Kataluna Antologio (1925; dua eldono: 1931); Bulgara Antologio (1925), Belga Antologio (du voĵumoj, 1928); Estona Antologio, unua parto (1932); Hungara Antologio (1933). La lasta estas la unua A. eldonita de la AELA (v.), kiu prenis en sian programon eldoni ĉiujare A-on de alia nacio. Preskaŭ prespeta estas la Ĉeĥoslovaka Antologio, kro-

me en preparo estas A-oj sveda, pola, itala, hispana, jugoslava ktp. KALOCSAY

Antila Werner, finno, instruisto de rusa kaj germana lingvoj, poste oficisto de eldonaj societoj, nun pensiunita. Nask. 14 jun. 1859 en Hausjärvi. Kunfondinto de EAF. Estinta L. K. Verkis lernolibron, 1906, vortarojn (E-F kaj F-E, 1906; F-E, 1911, 241 p. E-F, 1913, 90 p.)

Antwerpen. (Anvers). Grava havenurbo en Belgujo, 427.247 loĝantoj. 7-a UK 20—27 aŭg. 1911, 1753 partoprenantoj el 42 landoj; oni provis novan formon de la organizo: rajigitaj de'egi'oj. — 20 a UK, 3—11 aŭg. 1928, 1491 partoprenantoj el 36 landoj. 20-jara jubilea festo de UEA; ĉefa temo: E en radio.

Aoro. Sistemo de int. stenografio, de R. Sprötte, 1911, disvastigita antaŭmi e.

APA, mallongigita nomo de la int. societo »All Peoples' Association« (Asocio ĉiupopola), fondita en 1930 kun celo interkonigi la popolojn de la mondo kaj fortigi la amikecon inter ili. Ĝi faras nenian distingon de raso, rango, kredo, koloro aŭ politika partio kaj deziras kunlabori kun ĉiu organizaĵo, celanta mondamiĝecon kaj int. kunlaboron. La membreco ne konflikta kun la devoj de civilano aŭ kun lojaleco al la propra lando. APA klopodas interkonigi la popolojn per kontakto persona, per la preso, per radio, per korespondo, kaj per interŝanĝo de univ. profesoroj, studentoj kaj ĵurnalistoj; kaj sentigi al alilandano, ke li estas en hejma atmosfero, kie ajn li troviĝas. Centro: 99 Gower Street, London, W. C. I. Fondinto: Evelyn Wrench, red. de »The Spectator«. Subkomitato estis starigita por konsideri la helplingvan demandon. E estas unu el la lingvoj studataj (parolataj) ĉe la lingvovespe'oj de la London-a filio.

Applebaum (ap'lbaum), Jakob David, hebreo, komercisto. Nask. 14 nov. 1877 en Mszoznow, Po'ujo. Rotariano, pa'l'isto. E-istiĝis 1910. Prez. de Lancs. kaj Cheshire Federacio, 1915—20. Multaj oficoj en BEA. Inicianto kaj Sekr. de Z-a Monu-

mento. Trad. Struvelpetro, Barono Munchausen, k. a.

Arabeno Michele, italo. Nask. 31 marto 1872 en Genova. E-isto de 1911. Vizitis de la sepa UK en Antwerpen ĉiujn aliajn. Ĉe la kongresoj tre konata sub nomo: Onklo Miĉjo. UEA-del kaj subtenanto de 1913. Tradukis novelojn, rakontojn, sonetojn, monologojn kaj Devoj de la Homo de Mazzini, kiu libro estas eldonita en 10000 e-roj pagita per monko'ekto kaj disdonita tra la mondo en 1922. Pro tiu ĉi traduko li ricevis prof. titolon.

Arabujo. En 1905 en Aden propis Cap. H. E. Jacob. En 1907 kaj 1908 aperis lerno'libroj por araboj (de Muusbah, 43 p. kaj de Haddaj, 56 p.). I. SIRJAEV.

Archdeacon (arŝdik'n), Ernest, franco. Nask. 28 marto 1863 en Paris. Unue fariĝis advokato. Dum sia tuta vivo inte.esiĝis pri ĉiuspecaj sciencaj problemoj, eltrovis plej diversajn perfektigojn en fotografarto, kartografio, ktp. Li staras inter la unuaj apostoloj kaj praktikantoj de la interkomunikigaj s'ortoj: sfera balono (1885), aŭtomobila veturado, aviado. Dank'al lia kuraĝigo kaj malavareco, Serpollet, kiu estis eltrovinta la multotubetan vaporkaldronegon, povis konstrui la unuan praktikan vaporveturi'on, kaj ambaŭ vo'iris de Paris al Lyon (500 Kilometroj) en dekunu tagoj! Tio estis la unua vojaĝo en aŭtomobilo, naskiĝo de nova tempo. En 1896 A. kunfondis la Aŭtomobile-Club, kiu estis energie antaŭenpuŝanta la uzadon de aŭtomobilo. A. serĉis alian progreson diskuta'an, li konstruis diversajn aparatojn por aerveturado, kaj, jam en 1904 aldonacis duone premion da 50000 fr. por la unua eksperimentisto trafugonta unu kilometron ronde; tiun premion gajnis Farman la 13 jan. 1908: naskiĝo de nova tempo. A. serĉis alian progreson diskutatan por helpi al ĝia triumfo, kaj E-iĝis en 1908. Li verkis sennombrajn artikolojn en multaj E-aj kaj francaj ĵurnaloj kaj revuoj. Fariĝis prez. de la Pariza Grupo, poste de SFPE (de 1926). Malavare fondis kun Warnier la Domon de E, kiu celas helpi al la

propagando per ĉiuspecaj rimedoj, precipe per monoferoj. Kreis multajn premiojn por kuraĝigi la lernantojn ktp. Klopodis por unuigi ĉiujn aktivajn E-istojn. Ĉiama propagandisto per paroladoj, artikoloj, personaj klopodoj, li altiris aŭ helpis altiri al E multajn valorajn aliĝantojn el altaj medioj. Verkis prop. libron, 1910. LK, 1932. L. BASTIEN.

Argentina Esperantisto. Organo de AEA, fondita en 1917; formato 25×17.

Argentino. (Suda Ameriko). La unua E-isto estis E. Gösta en Buenos Aires en 1899, sed la propagando komenciĝis nur post 5 jaroj, kiam la lingvo ree estis enportita, kredeble el Peruo. La pioniroj estis d-ro C. C. Dassen (1904) kaj Jos. Olivares, Enr. Bruses kaj J. Juamed (1905) en Chacabuco. Artikoloj aperis de Juamed kaj Olivares en la gazetoj »Revista de Menorca« kaj »El Mentor«. En 1906 en Buenos Aires estis fondata E societo kaj poste ankoraŭ du grupoj. En 1909 estis aranĝataj kursoj en la lernejo »Presidente Roca« kaj en Cordoba estis fondata societo. En 1913 multe laboris por E en Bahía Blanca Delfi Dalmau, konata kataluna E-isto. En 1916 oni fondis Argentinan E Asocion kaj de tiam la movado ĉiam progresis. Grandan helpon alportis kelkaj influaj homoj kaj precipe urbkonsilistoj de Buenos Aires, altiritaj al E en 1925. Unu el ili, Remigio Iriondo petis de la urbo subvencion de 2000 pesetoj por AEA. De 1917 aperis (neregule) la A E-isto. En amatora »Radio Revista« aperis regule kursoj de E kaj ofte interesaj artikoloj pri la E movado; red. de la fako estis M. Gómez. Laŭ la Dietterle-statistiko en 1928 E-istoj estis en 37 urboj. AEA etendis sian agadon ĉefe pere de siaj korespondaj kursoj ankaŭ al aliaj sudamerikaj landoj. Laŭ la ICK-raporto 1930 »AEA sukcese interesigis oficialajn rondojn. Ankaŭ kelkaj sciencaj asocioj enkondukis E-n kiel helpilon por siaj celoj.« Laŭ la raporto en 1931 »AEA daŭrigis sian kutiman viglan laboron. La revolucio kaj la registara ŝanĝo iom interrompis progreson de diversaj entreprenoj.« Laŭ la raporto en 1933

»la ekonomia situacio malfavoris pli vastan agadon.« En 1933 UEA-del. estis en 12 lokoj. I. SIRJAEV.

Ariste Paul, estono, magistro de filozofio kaj filologio, fonetikisto. Nask. 3 febr. 1905 en parofo Torma. Kursoj en Tallinn kaj Tartu. Kunlaboranto de E gazetoj kaj tiu de EIE, membro de la komisiono por la granda vortaro E Estona.

Arnaudov Mihail, bulgaro, d-ro, univ. prof. de literaturo. Prezidis publikan kunvenon dum prop. E-semajno en Sofia en 1924 kaj faris paroladon pri E.

Arnessen Arne, norvego, antaŭe: telegrafisto, librotenisto, kontorĉefo, nun: revizoro en Bondernes Bank en Oslo. Nask. 11 nov. 1884. Ekstudis Volapükon en 1903 kaj E-istiĝis 16 majo 1904. Fondis E klubon kaj gvidis la unuan kurson en Narvik 1907, la duan en Bergen 1910. Kas. de NEL depost 1923, ĝia ĝen. sekr. de 1932. Prez. de EK en Oslo 1924—26, kaj de-post 1929. Del. de UEA de-post 1922 kaj ĉefdel. de 1932, ktp. Skribis sian unuan artikolon pri E en 1906 kaj poste multajn en diversaj gazetoj, redaktas regulan ĉiusemajnan E-kronikon en ĉefaj por-instruistaj gazetoj de-post 1931. Organizinto de ĉiuj (ĉ. 50) Cseh-metodaj kursoj, gviditaj de eksterlandaj instruistoj dum 1930—33, gvidanto de la unua somera E kurso por instr. en N., 1930. Multaj paroladoj pri E (ankaŭ en radio). Laboro precipe inter geinstruistoj kaj rotarianoj. Prop. broŝuro, 1933. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Arnhold Georg, germano, bankisto, sekreta komerca konsilanto, Würtemberg-a konsulo. Nask. 1 marto 1859 en Dessau. Unu el la gvidantaj ekonomiaj fakuloj de G. Eminenta pacifisto. Precipe pro pacifistaj motivoj li lernis kaj propagandis E-n, grave helpis la movadon idee kaj materie. Li kunfondis la Saksan E Instituton kaj estis ano de ties patrona societo.

Arnhold Heinrich Gustav, germano, bankisto, bavara konsulo, d-ro de jurscienco. Nask. 22 jul. 1885. Instigite de la konata pacifistino Bertha

von Suttner li fariĝis E-isto. Ĉefe al li oni dankas la prezentadon de Ifigenio ĉe la UK en Dresden. De 1912 kasisto de GEA, 1911—14 prez. de la Saksa E Ligo. Partoprenis en ĉiuj UK ĝis la milito. L. K. Dumviva membro de UEA, ktp. Senlaca propagandisto per paroladoj kaj artikoloj. Enkondukis E-n en la propra bankejo (kreditletoj, diversaj formularoj, korespondado.) Per disponigo de ĉambrego en la bankejo li donas konstante belan hejmon al la E Societo en Dresden. Atingis multe ĉe aŭtoritatoj por E.

Artigas Lasala Jozefo, hispano, lernejestro en Madrid. Nask. 21 nov. 1870 en Pina. E-isto de 1911. Membro de HEI. Kursgvidado, grupfondado. Artikoloj en nacia gazetaro.

Artigues (artig) René, (ps. ERA), franco, militkuracisto, Nask. 21 majo 1860 en Besançon. Konata precipe pro literaturaj: La Marmalsano, La filino de la feinoj, La Filo de la Sorĉisto, La Maskito (L. I., Revuo, ktp.) kaj kritikaj saĝoplenaj flugfolioj (LI 1908—1913). Faris raporton pri pluraj Kongresoj. Agema propagandisto en medicinaj kaj ruĝ-krucaj medioj. — LK, 1909.

Artikolo. En E ekzistas nur la difina artikolo la. Ĝia uzo prezentas malfacilon ĉefe al tiuj, en kies lingvo ĝi ne ekzistas, ĉar la Fundamento ne orientas pri ĝia uzo, dirante nur, ke ĝi estas uzata kiel en la naciaj lingvoj.

La A-on oni devas uzi:

1. se temas pri io jam konata, difinita, jam priparolita;
2. se temas pri io kiel reprezentanto de sia klaso, kategorio;
3. se temas pri io ununura, sola en sia speco.

Do la A. propre anstataŭas la vortojn: tiu, tiu certa, ĉiu, sola, ununura; kaj ĝi estas kaj devas esti uzata nur, se anstataŭ ĝi prove estas metebaj tiuj ĉi vortoj sen la aliigo de P senco.

Pli vastan pritrakton pri la uzo de P A. oni trovas en: Fruictier-Grenkamp: Kompleta Gramatiko

kaj Vortfarado, 1930; Kalocsay: Lingvo, Stilo, Formo, 1931.

A. nedifina ne ekzistas en E. Tamen oni renkontas la vorton unu uzatan tiasence. Tio estas, se ne eraro, almenaŭ nekorekto de stilo; en ĝia uzo oni estas gvidata de nacilingvaj kutimoj. En okazo de efektiva neceso oni povas uzi iu (se temas pri io apartigita el certa grupo), aŭ ia (se temas pri io tute nedifinita). Ekzemple: »Mi vidis iun serviston« (iun el certa nombro de servistoj). »Mi vidis ian serviston« (ian ajn, neniel difinitan).

Kelkaj lastatempe pretendas la uzon de unu, kiel nedifina A. Sed ĝia enkonduko estus tute kontraŭ la ĝisnuna lingvokutimo. Tiamaniere ja oni devus diri: »Li estas unu bona homo«, kiel germane oni diras: »Er ist ein guter Mensch«.

v. Sintakso. KALOCSAY.

Arvisto Max Erik, estono, magistro de kemio en Nõmme. Kunorganizinto de la Tartua ES, de la unua Estonuja E-kongreso, (1922) ktp. Verkinto de la plej detala E lernilo estona por memlernantoj, 1926, ĉ. 200 p.

Asai Erin, japano, prof. de lingvoscienco, malaja lingvo en Kolegio por fremdaj lingvoj de Osaka; bonzo. Nask. 25 marto 1895 apud Kanazawa-si. 1918, finonte studentan vivon, al Imp. Univ. de Tokyo, li prezentis tezon, skribitan en E »Polineziaj popoloj kaj iliaj lingvoj«. Unu profesoro opiniis, ke E ne estas lingvo, malgraŭ tio tezo akceptita. Poste kelkaj imitis tiun ekzemplon. Estis ano de J E Komerca Korporacio. Unu el la tri fondintoj de JEI.

Ashby (aŝbi) Joseph, anglo, svedenborga pastro. Nask. 1847 en Ellington, mortis 30 okt. 1922 en Southport. E-isto de 1904. Tradukis kaj disdonis multe da E flugfolioj pri Svedenborgismo.

Ashley (aŝli) Archibald John, anglo, anglikana pastro. Nask. 1 aŭg. 1884 en Kent. De 1915 parofestro en Farnley Tyas, apud Huddersfield. E-istiĝis 1906. Iniciatis fondon de Eklezia E-ista Ligo, 1913; ĝia sekr. 1913—25; poste neoficiale daŭrigis tiun laboron. Red. kaj parte trad.

La Libron de Komuna Preĝo; kunlabore kun pastro Curry trad. Reĝo Lear de Shakespeare. Red. de La Eklezia Revuo, 1917—22.

Asocio de E-istaj Libro-Amikoj, v. AELA.

Aspazio. Tragedio en 5 aktoj el la antikva greka tempo. Verkis A. Svjentoĥovski, el la pola trad. Leono Zamenhof. Kolekto de La Revuo. 1908, 157 p. »Vi trovos en la dramo perlojn de malvarma penso filozofa kaj rubenojn de varma kredo je venko de grandaj koroj kaj animoj geniaj.« (El la Postparolo de Belmont.)

Atanasov D. Atanas, (ps. Ada), bulgario, privata oficisto, antaŭe gimnaziara instruisto de literaturo. Nask. 12 febr. 1892 en Sofia, loĝas samloke. En 1910 fondis kaj prezidis studentan E grupon ĉe la Sofia Universitato. En 1911 sekr. de BEL, de 1920 ĝis 1926 vicprez. de BEA kaj red. de B E-isto. Prez. de BEA 1927—28. Tradukis kelkajn verkojn, aŭtoro de lernolibroj, el kiu unu aperis en 7 eldonoj kaj 36.000 e-roj. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Atanasov Georgi, bulgario, pianisto. Nask. 12 dec. 1881 en Nova Zagora, loĝas en Sofia. Kunlaboris por Rondiranto, trad. Unuaj lecionoj de Cart, verkis E. muzikajojn, estis kunred. de Danubo.

Ateistoj, v. Liberpensuloj.

Atta Troll. Somernokta sonĝo (poeziaĵo) de Heine, el la germana trad. Zanoni. 1925, 96 p. »Peni redoni en E la esencon de la spriteco kaj lerteco de la aŭtoro, estas kvazaŭ elekti plej armitajn malamikojn, por ke la venko estu pli triumfa. La tradukinto laboris sukcese.« (G. S., 'E' 1925, p: 170.)

Aŭro. Organo de SOĈNE, blindula societo en Ĉeĥoslovakujo, fond. en 1920; formato 28x25. Red. Vuk Echnr.

Austerli'z (austerlic) Vilmos, hungaro, d-ro, kuracisto en Bardejov-Bártfa (Ĉeĥosl.) Nask. 28 majo 1873 en Eperjes (nun Prešov en ĈSR). Aŭtoro de pluraj verkoj sciencaj. Fondinto de EG en B., UEA-del. Estis sekr. de TEKA.

Faris vojaĝon por propagandi E-n tra Finnlando ĝis la nordpolusa cirklo en 1925. Artikoloj en Int. Med. Revuo ktp.

Aŭstralio: Lando kaj Popolo. Originale verkita de A. Delsudo kaj Lauri Laiho. 1927, 93 p., 29 fotoj. Bela kaj interesa libro pri la nuna Aŭstralio. Aperis ankaŭ en finna traduko.

Aŭstralio. Pro la relativa neneceseco de helplingvo en unulingva kontinento la progreso de E estis en A. malrapida. Krome la angla lingvo bone servas al aŭstraliano dum la veturado, ja preskaŭ ĉiuj vojoj de la vaporŝipoj kondukas al britaj teritorioj. Nur malrapide, kiel ankaŭ en Britujo, oni ekkomprenas, ke la angla civilizado estas nur negranda parto de la greko-latina civilizado.

Certe antaŭ 1900 lernolibroj en angla lingvo ekatingis A-on, eĉ kelkaj personoj provis lerni E-n. Ĉ. 1904 d-ro John Pollen vizitis antipodojn kaj en Adelaide li ricevis bonan akcepton de univ. prof. Naylor (amiko de prof. Murray). Naylor mem baldaŭ forvelkis rilate al E, tamen en 1904 lia eldiro helpis al la propagando.

Prof. Urlaub, privata instruisto de la germana lingvo, prenis la aferon kaj ofte preparolis ĝin. En 1906 interesiĝis William Muirden, posedanto de Komerca kaj Prepara Gimnazio, kredinte, ke E »havas komercajn eblecojn« kaj aranĝis, ke Urlaub faru lekciojn. La komercaj studentoj ricevis ordonon ĉeesti. La ĉambro pleniĝis, — mi inter ili. Urlaub lektiis angle kun tre germana parolmaniero. La studentoj malatentis, oscedis, ridis, intermetis malsagaĵojn. Subite inter la bruo venis Muirden. Silento. Urlaub faris simplan demandon, sed neniu respondis. Muirden tondravoĉe alvokis al iu respondi, la alvokita ne povis, poste mi sekvis kaj diris ian stultajojn, kiu furiozigis la iom ekscitigeman Urlaub. Poste la aŭskultado estis pli atenta kaj oni tondre aplaŭdegis — pro la fino. Kelkaj promesis aĉeti lernolibron kaj almenaŭ mi aĉetis libreton de Bullen por 8 pencoj. Post trafolumeto la libro ripozis dum kvin jaroj en la

ŝranko. Kunloĝado kun pastro S. Lenton, kiu ŝatis serĉadi en la libro-ŝrankoj: kaj paro de kunlernantoj fariĝis E-istoj. Plua kvino da jaroj kaj unu el ili (mi) translokiĝinte al Melbourne, staris antaŭ aŭdantaro, konsistanta el kvar profesoroj kaj tricent homoj en la universitata domo, por fari sian unuan seriozan prop. paroladon.

Dumtempe la vizito de Pollen fruktiĝis, li trovis E-istojn en Melbourne (G. Gordon, J. G. Pyke k. a.), en Sydney (G. Collindridge, E. Pryke) kaj en Novzlando. Bonaj kluboj starigis. En 1911 okazis la unua E kongreso en A. en Adelaide. La organizantoj plenigis la liston de »subtenantoj« kun nomoj de 4 ministroj kaj 24 gravuloj alispecaj, sed dubinde estas, ĉu iu el ili krom ministro de edukado, Conybeer, rigardis la aferon serioza. La ministro celis diri kelkajn vortojn E-e ĉe iu festeno, kiuj sufiĉe ridigis la aŭdantaron kaj eble bone impresis la publikon pri la facileco de E. La kongreso sukcesis, sed la organizantoj lasis ŝuldojn nepagitajn, kiuj fuŝis la reklamon por la E-istoj en Adelaide kaj lasis al ili ĝin pagi. Estis kelkaj jaroj antaŭ ol la perdo pagiĝis sub gvido de Waterman. La kongreso kuraĝigis la s-anojn en aliaj urboj. Plivigliĝo. Eĥoj de la idista afero trapasis sen tro multe da mautilo, sed ĉiam estis unu-du personoj, kiuj uzis la »preson« por malfunkciigi la radojn.

Melbourne eble prenas la laŭrojn kiel la plej forta E centro en A. M. E Society estis forte starigita, sed ĝi ne daŭris sen interna disputo. W. L. Edmanstone ekŝiĝis kaj en alia strato starigis M. Komerca Klubon E-an, kiu laboris por E tra la militegaj jaroj. Edmanstone mem foriris al Wellington, (Novzlando) kaj tie starigis alian klubon kaj daŭris fari multon ĝis la nuntempo. La komerca grupon gvidis Smart, poste L. E. Thomson, kun helpo de multe el la malnovaj anoj de la pliaĝa M. Societo. Sed en 1920 okazis alia interna disputo inter la M-anoj kaj W. J. Drummond starigis la M. E Klubon: prez. estis Pyke kaj sekr. R. R. Rawson. La komerca klubo

ekŝiĝis kaj ĝiaj anoj iris al la nova grupo. Ambaŭ kluboj funkcias ĝis hodiaŭ kaj krome grupoj en kelkaj antaŭurboj: Coburg, Surrey Hills ktp. En Sydney L. E. Pfahl estis kaj estas la konstanta kolono de la movado. La floranta periodo de la S. Societo okazis, kiam d-ro F. Williams translokiĝis el Melbourne kaj vigle organizis publikajn paroladojn antaŭ la homamasoj, kiuj kolektiĝas ĉiudimanche en la Sydney-Domain-Parko; ankaŭ Awayl kaj V. Rutland faris sian parton. Tiamaniere miloj da homoj aŭdis pri E kaj ricevis presajon pri ĝi. En Brisbane ne-granda, sed bone starigita grupo de-longe funkcias; nun sub la gvido de M. Hyde. En Adelaide W. L. Waterman daŭras labori por la loka grupo kaj en Perth prezidas Byatt, kiu estas ankaŭ prez. de la landa organizo AEA.

Oficiala subteno? Kelkaj ministroj parolis favore, sed ne faris pluon. Ministro de edukado Davies en 1932 en Nov-Sud-Kimrujo promesis starigi Eksperimenton laŭ la Ecclesplano en iu lernejo de Sydney, sed ĝis nun la direktoro de la edukado, Thomas, sukcesis flankenirigi la deziron. Inter la universitataj homoj post nedaŭra subteno de Naylor alportis fortan kaj longedaŭran helpon Meredith Atkinson, prof. de ekonomio ĉe M. Univ., kiu poste ekŝiĝis el la Universitato kaj dum kelkaj jaroj (ĝis sia morto) donis senavare lokon por E en sia gazeto *Ste ad's Review* Gravan sukceson signifas la E-aj kaj por E-aj paroladoj de R. R. Rawson el la Radio Stacio en Melbourne, unufoje dum ĉiu monato dum kelkaj jaroj.

Izola laboro okazis inter policistoj kaj inter skoltaj, sed mankas la frukto. Peacock, oficisto de la Sava Armeo faras propagandon en sia fako. Eble la plej interesa laboro estis tiu de Edmanstone en Wellington inter malliberigitaj, konsentite de la direktoro de la malliberejoj.

L. E. THOMSON

Aŭstria Esperantisto. Organo de AEA, fondita en 1924 de H. Steiner kiu estas red. ĝis nun. Formato 24×16 cm.

Aŭstrio. (Ĝis 1914.) Aŭ. pro sia multlingveco estis taŭga grundo por int. helpa lingvo. Fakte kelkaj provoĵ por tia idiomokazis en la 19-a jarcento. Ankaŭ Volapük tie ĉi bone prosperis, sed ĝia malsukceso malbone influis la unuajn paŝojn de E. La unua lingvisto en la tempo de Schleyer, kiu favore prijuĝis la problemon de int. lingvo, estis prof. Schuchardt en Graz.

Estis negermanoj, kiuj unuaj propagandis E-n, precipe ĉeĥoj. La unua grupo fondiĝis en Brünn-Brno. La unua E-gazeto, la E-a Revuo estis eldonata de ĉeĥa instruisto Ĉejka. Li, kiel granda parto de la loĝantaro de la provinco Moravujo, ankaŭ bone komprenis la germanan lingvon kaj tiel aldone aperigis ankaŭ germanajn numerojn de sia gazeto (1902—04). Sed detala lernolibro por germanoj tiam ankoraŭ ne ekzistis. En 1903—06 aperis lernolibroj, verkitaĵ de Jean Borel el franca Svisujo, de Johan Schröder el Hungarujo (lernolibro en 1906, vortareto en 1912), kaj de Alfred Fried, la fama pacifisto el Berlino.

Schröder, redaktoro de ĉiutaga gazeto, estis la iniciatinto de E-propagando en Wien. Lia ĉefa helpanto estis Fred Ahlgrim. Ili kun multaj amikoj ĉiusemajne kunvenis en restoracio en Schauflegasse por ekzercadi la lingvon. Ilin kelkfoje vizitis Otto Simon, juna gimnazia profesoro, tiam en Ung. Hradisch. Simon, kiu ne komprenis la boĥeman lingvon, dum paska festo 1904 vizitis Ĉejka en Bistritz kaj okazis pluhora interbabilado en E inter germano kaj ĉeĥo, cetere tre paca en tempo de akra konflikto inter tiuj ĉi ambaŭ nacioj.

En somero 1905 okazis la unua UK en Boulogne: ei Aŭ. germanlingva ĉe-estis nur Schröder kaj Simon; ambaŭ fariĝis anoj de LK. La efiko de la kongreso por germana Aŭ. estis sufiĉe granda, multaj gazetoj raportis, i. a. »Zeit«, »Neuigkeits-Weltblatt«, »Mährisch-schlesischer Tagesbote« ktp. En »Neue Freie Presse« aperis artikolo de W. Ostwald, kiu multege efikis.

Tiam en kelkaj urboj fondiĝis lokaj grupoj. Krom Wien ankaŭ en Graz, kien du studentoj el Moravujo (Pettera kaj Teltschik) importis E-n,

en Reichenberg, okaze de landa ekspozicio, al kiu partoprenis E-istoj, — la unua E-a ekspozicio en Aŭ. — sub gvidado de Schade kaj Richter, en Leitmeritz per Wilhelm Heller, en Teplitz-Schönau per kuracisto d-ro Freisinger naskiĝis grupoj, kiuj en 1908 okaze de la 4-a UK en Dresden kuniĝis al Ligo de Germanlingvaj E-istoj en Aŭstrio. Oni eĉ provis eldoni apartan gazeton Informaj Raportoj, poste oni pligrandigis ĝin sub titolo Germana Aŭstria E-isto.

Car paŝo post paŝo la publiko interesiĝis por E, el kiu kelkaj eĉ esperis la solvon de la lingvaj konfliktoj en Aŭ., jam en 1905 tri gravaj Wien-aj organizaĵoj (la komerca unuiĝo; la etika societo; la pedagogia asocio) aranĝis po unu vesperon kun E-parolado. Aliaj gravaj unuiĝoj sekvis, ili akceptis rezoluciojn favore al E. En katolikaj preĝejoj okazis la unuaj E-lingvaj predikoj, Martin Klein (»Moko«) propagandis E-n inter la laboristaro. Novaj grupoj naskiĝis; en Wien post la E-Klubo (1904) »La Fideleco« (1907), kiu sin okupis kaj okupas ne pri propagando, sed pri traduko de lingve malfaci'aj tekstoj, la »Junularo« (fondo en 1910), kiu propagandis inter gejunuloj; la Katolika Grupo (1912); Virina Sekcio (1909). En 1909 estis 142 grupoj kaj 60 informejoj en la tuta antaŭmilita regno. J. Glück kaj d-ro Sós en 1910 verkis sukcesplanan lernolibron. Sós kiel delegito de UEA povis konstati, ke multaj eksterlandaj E-istoj traveturis Wien —on kaj ofte la Wien-anoj povis helpi al ili.

Kongresoj okazis en Wien, 15—16 majo 1910, en Praha 15 aŭg. 1911, en Graz 10—15 majo 1913 kaj en Franzensbad, 31 majo—1 junio 1914, kie oni malkovris Z-monumenton, la unuan en la mondo. Kun la negermanaj E-istoj en Aŭ. okazis antaŭlaboroj por komuna organizo, sed sen sukceso.

En 1909—11 la E-istoj en Aŭ. sukcese kontraŭbatalis ĉiun provon, propagandi por Ido aŭ aliaj ŝanĝoj de Fundamento. En kolonelo Zwach ili trovis talentan poeton, kiu per originaj poemoj kaj tradukoj el Schiller

riĉigis jam antaŭ la milito la literaturon.

Kelkaj instruistoj, krom Simon ankaŭ Sacher, Macho, Fanta Süsner kaj la fama scienculo Fuchs fondis en 1913 la unuan fakan instruistan societon inter la aŭ. E-istaro. Ili eĉ starigis privatan ekzamenan komitaton, por faciligi al la grupoj elekti taŭgajn kursestrojn. En la jardeko antaŭ la milito okazis ankaŭ la unuaj paŝoj por enkonduki E-n en la programon de lernejoj. La E-a organizo de la instruistoj sukcesis gajni la oficialan administracion por E-instruado nur en 1919, sed jam en 1909 en komerca akademio okazis kurso (Simon), en 1910 en komerca lernejo (Kapamadzia), kaj versperkursoj en publika unuagrada lernejo (Macho), en 1913 Kaftan fondis privatan lernejon (Antaŭen), ŝtate rekonitan.

Estis grava sukceso ĉe la ministerio por fervojoj, ke ĝi aperigis du belegajn librojn turismajn en E: »Pejzaĝoj de Aŭstrio« (1911, 120 p.) kaj »La novaj fervojoj tra Aŭstria, Alpoj« (1912, 64 p.). E-istoj atingis sukcesojn eĉ ĉe la militistaro: la ministerio por milit-aferoj donis la permeson (1908), ke oficiroj kaj militistoficistoj aliĝu al E-unuigo, Vien; en 1910 kapitano Engel parolis en Milit-Scienca Asocio; en 1911 okazis kurso kun 56 oficiroj en Vien (Lochner).

O. SIMON.

(Ekd e 1914) Post la eksplodo de la milito German-Aŭstria E-isto ĉesis en dec. kaj kun ĝi grandparte ankaŭ ekipozis la movado. Nur kelkaj povis daŭrigi la laboron. Steinhauer kaj Steiner faris kursojn en diversaj lokoj ĉe »Nordbahn«, kie ili deĵoris dum la milito. Steiner eĉ fondis grupon en Korneuburg. Kelkaj kursoj funkciis en Vien (Kaftan), Innsbruck, Graz, Plzen, Praha, Capodistria ktp., Simon gvidis kurson en Nova Komerca Akademio en Vien (1916).

En 1917 la movado fariĝis iom pli vigla, oni gvidis kursojn en multaj lokoj. Ankaŭ grava sukceso ne mankis: 17 apr. 1917 dir. Schamanek komencis prelegi en la Teknika Altlernejo en Vien, li estis la unua lektoro de E ĉe altlernejo en la mondo. Ĝis fino de 1918, kiam la iama Habsburg-monar-

ĉio disfalis kaj estiĝis la nova, malgranda Aŭ., laboris en ĉiuj partoj de la regno fervoraj E-istoj, el kiuj estu citataj kelkaj: Schulhof, Ghez, Kamarlyt, Steinhauer, Kaftan, Zwach, Hartwich, Sós, ktp.

En 1919 komenciĝis nova vivo. Akademia E-Asocio estis restarigita de W. Illing. En Leoben kaj Donnawitz laboris Lidl, en Innsbruck Bederlunger kaj Blaas, en Graz Bartel, Halbedl kaj Rogler, en Eggenberg Pernegg, en Vien Frey, Schamanek, Schröder, Siedl, Cech, Kaftan, Steinhauer ktp. Post 5 jara manko aperis gazeto *Nova Tempo*, (vivis ĝis 1922), fondita de F. J. Schade; krome *La E-isto* de d-ro E. Pfeffer (ĉesis en 1921).

3 apr. 1920 estis fondita *E-Delegataro* en Vien, ĉefe laŭ iniciato de Kaftan kaj Zimmermann. Fondiĝis en 1921 grava grupo en Salzburg kaj okazis kursoj (ankaŭ poste) en la tiea Borromäum kaj en la Popolaltlernejo en Villach. E alportis ankaŭ praktikan utilon: 4 majo 1921 326 infanoj, speciale el Graz, forveturis al Hispanujo per helpo de hispanaj E-istoj kaj restis tie 1—3 jarojn. En 1921 la membro de la kursoj pliiĝis. Okazis multaj kursoj en Vien, Melk (Österreich), en Graz en la burĝlernejo Paulinum por 105 lernantoj (instr. Ländler) kaj ankaŭ por la infanoj kaj ties gepatroj, kiuj veturis al Hispanujo (Hackl), en Leoben (Puntigam) en Innsbruck (Blaas, Egger), en Villach ktp.; krome en ĉefa gimnazio estis enkondukata E pere de d-ro Jokl. Viena Foiro en 1921 la unuan fojon eldonis varbprospektojn en E kaj daŭrigis tion ĝis 1926.

Je Pasko 1922 okazis en Salzburg la 1-a Sudgermana E-Kongreso kaj samtempe granda E-ekspozicio, kiun vizitis ĉ. 15.000 personoj. En 1922 novaj grupoj fondiĝis en Saalfelden kaj Hallein. En Vien fondiĝis tramista grupo, en 1923 la grupo Progreso, en 1924 R. M. Frey fondis E-Organizon de Ofichavantoj de Urbo Vien kun 462 anoj kaj la komunumo Vien disponigis al ĝi hejmon en la magistrata domo.

Montriĝis klopodoj por fondo de landa organizo. Jam en 1922 centro

por la propagando estis kreita per la entrepreno Nova Tempo, Wien kaj 6 jan. 1923 estis fonda'a tut'anda organizo sur neŭtrala bazo Aŭstria E-Delegitaro (AED), kiu havis 32 grupojn; prez. fariĝis Schamanek, Bartel kaj Simon; ĝen. sekr. Schade; en 1926 oni elektis prez. Steiner, ĝen. sekr. Cech; en 1927 ĝen. sekr. Bernfeld.

Okazis kursoj oficialaj aŭ duonoficialaj: Schamanek per dekreto Z II/1008 25 febr. 1922 ricevis permeson instrui en la burĝ'ernejo de Purkersdorf kaj en la blindullernejo. Ankaŭ li faris en 1923 kursojn por instruistoj kiel sekvo de Geneva konferenco. Frey sukcesis gvidi kurson en la grava popolduka societo »Urania«.

En 1923 oni komencis prepari la 16-an UK en Wien. Ankaŭ policistoj lernis E-n kaj ili portis dum la kongreso brakubandon kun la vorto E. La 16-a UK okazis 6—14 aŭg. 1924 sub la prezido de ministeria konsil'ano Minibek. Prez. de LKK estis J. Schröder, ĝen. sekr. Schade kaj krome estis en la LKK Hartwich, Sós, Zimmermann, Simon, Smital, Zwach, Schamanek kaj Pfeffer. Aliĝis 3400 anoj el 40 landoj, sed la kongreson malhelpis la terura ekonomia situacio en multaj landoj kaj speciale en Germanujo; parte tio estis la kaŭzo de grandega defcito, pagita nur jarojn poste. Dum la UK oni prezentis la dramon de Raimund »La Malŝparulo« kun aktoroj de la fama »Burgtheater«. Okazis granda pacifista manifestacio, kiun aranĝis lerte Frey. En la kongresa jaro okazis ankaŭ fondo de Aŭstria E-isto de H. Steiner, la 2-a Kongreso de la Tutmonda Polica Ligo en Wien, en ĉeesto de multaj oficialaj personoj.

En 1925 oni daŭrigis la aranĝon de landaj kongresoj. En Salzburg 9—12 aŭg. okazis la 5-a Tut-aŭstria E-Kongreso sub la protekto de landestro Rehrl kaj sub prezido de prof. Christianell; ĉeestis 200 personoj. 6-a Kongreso en Graz 22—24 majo 1926 sub la protekto de landestro Rintelen kaj prezido de ĉefŝtabkuracisto D'ettl, ĉeestis 250 partoprenantoj. 7-a kongreso en Wien 4—6 junio 1927 sub la protekto de ministroj por instruaferoj

kaj komerco, policprez. Schober ktp; ĉeestis 700 personoj en la festsalonego de »Hofburg« sub la prezido de Steiner. Samtempe dum 6 semajnoj en majo kaj junio okazis granda E-ekspozicio, kiu ampleksis tutan etaĝon de grandmagazeno Herzmannsky, kaj kiun vizitis ankaŭ la kanceliero Seipel, kardinalo Piffl, po'ieprez. Schober ktp. La 8-a okazis en Baden ĉe Wien 26—28 majo 1928 sub la protekto de landestro Buresch kaj sub prezido de Steiner; bone preparis Pronay en Baden; ĉeestis 200 personoj. La 9-a Kongreso okazis en Linz en 1930 sub lerta aranĝo de Wannek; protektorato estis landestro Schlegel, prezidis Steiner. Oni elektis prez. de AED dir. Wannek.

Intertempe fondiĝis grupoj en Grammat-Neusiedl (F. Svehla) en Baden (Pronay), Seyr (Wimmer), Braunau (Haselbauer), Siegmundsherberg (Scheuer), Katolika Grupo en Wien XVI (H. Schiebl). Sed jam en 1928 aro da grupoj ekzistis el AED kaj 6 jan. 1929 fondis novan landan organizon Aŭstria E-Asocio (AEA). Fondiĝis ankaŭ Ligo de E-amikoj kaj ankaŭ prop. gazeto »Weltsprache«, sed baldaŭ malaperis ambaŭ.

30 julio — 2 aŭg. 1929 estis grava antaŭkongreso en Wien, kun malfermo de Int. E-Muzeo, kies fondo estas merito de Hugo Steiner, la ĉefa gvidanto de la Aŭ. E-movado. La 31 julio la prez. de la respubliko, Miklas, akceptis la reprezentantojn de la diversaj landoj en aŭdiencio. Sekvis akcepto en la Urbodomo kaj poste malfermo de Int. E-Muzeo (v.) Okaze de la malfermo Steiner eldonis ilustritan gvidlibron pri Wien kaj samjare strato en Wien laŭ la klopodoj de ALLE estis nomata Z-strato.

La organiza malpaco ne daŭris longe. 18 dec. 1930 sub prezido de R. Kreuz (Genève) okazis en Wien la reunigo de la du partioj AED kaj AEA, kiuj de nun laboras sub nomo AEA. Ĉefkunveno de AEA estis aranĝita 28—29 jun. en Salzburg, kune kun la 10-jara jubileo de la tiea grupo; ĉeestis ĉ. 100 E-istoj. En la ĝeneralkunveno de AEA 4 jun. 1933 Steiner estis elektata prez., Frey kaj Pfeffer vicprez. kaj Hovorka ĝen. sekr.

Vizitoj de kona'aj E-propaganditoj

havis rimarkindan sukceson. Scherer el Los Ange'es (1931) faris dum sia mondvojaĝo 8 paro'adojn en Wien (1 per radio) kaj krome en Graz, Krems, Linz, Steyer ktp. Scherer estis akceptata de prez. Miklas, kanceliero Buresch kaj urbestro Seitz. 5 apr. 1932 pastro Cseh venis al Wien kaj faris radio-paroladon, publikan provlecionon kaj per tio enkondukis la kursojn de la Morariu-ge'dzoj; la kursojn partoprenis 450 personoj. La organizantoj estis Hovorka, Cech, Kaftan, Pfeffer, la kvar anoj de la Labor-Komitato-Wien, kiu eklaboris jam en 1931. Por certigi pli efikan kunlaboron, 20 feb. 1933 fondiĝis Vienna E-Unio, kun la celo agadi per la unuigitaj fortoj de ĉiuj Vienaj grupoj. Prez. fariĝis Kafan, afergvidanto Hovorka.

Kelkaj fremdaj aranĝaĵoj estis utiligitaj je la bono de la movado. Mondkongreso de la Inform-Oficejoj okazis en Wien 14—18 dec. 1930. B. Selzer el Wien kaj R. Kreuz el Genève atingis en tiu nova laborkampo gravan sukceson, Selzer aranĝis ankaŭ fakan E-ekspozicion. Sur la programo de la Rotary-Mondkongreso, Wien, 22—27 junio 1931 estis propono de Sir Charles Mander, »Diskuto pri E«. La demonstracio de E-istoj Warner kaj Le Blanc (Paris), Applebaum (Bri'ujo), Frenckell (Finnlando), Arnhold (Dresden), Meihuizen (Hollando) bone sukcesis antaŭ 2000 personoj, kaj oni akceptis favoran rezolucion; la tutan aranĝon preparis Frenckell kaj Steiner.

En la kadro de »Katholikentag« en Wien sept. 1933 la katolikaj E-istoj havis apartan aranĝaĵon, kiun partoprenis ankaŭ episkopoj Majláth el Cluj kaj Gföllner el Linz kaj anstataŭanto de kardinalo Innitzer. Multe klopodis prez. Chiba, dir. Schiebl; Steiner varbis por la aranĝoj per radio. La katolika E-societo AKLÉ fondiĝis jam en 1924 kaj trovis simpatian ĉe diversaj ekleziuloj, okazis diservoj en E, (Minoriten-preĝejo) kaj kelkfoje kursoj en teologiaj fakultatoj ktp.

La plej gravaj sukcesoj estis akiritaj ĉe la fremdultrafiko. La ministerio por komerco kaj trafiko en 1927 eldonis la unuan faldprospekton en E »Tra Aŭstrio« en 20.000 e-roj

kaj ankaŭ en postaj jaroj la ministerio presigis denove tiujn belajn faldprospektojn en E, la 5-an fojon en 1933 en 10.000 e-roj. La prospektoj varbis efike por tiu ĉi malgranda lando, kaj la gvidanto de la fremdultrafikaj aferoj en la ministerio, sekcia konsilanto Deinlein raportis pri bonega sukceso pere de E-propagando (ĉe la 4-a int. kongreso en 1929.) La iniciaton sekvis ankaŭ la Fremdultrafika komisiono de Wien, la Aŭ. Trafik-Oficejo, la Foir-oficejo de Graz, la Landa Unuiĝo por Fremdulfrekvento en Linz, ktp.

Steiner, Frey kaj Cech entreprenis ankaŭ eksterlandajn vojaĝojn por varbi al la fremdultrafiko pere de E-paroladoj. Steiner faris en okt. 1930 lumbildparoladojn pri Aŭ. tra 18 lokoj germanlingvaj en norda Ĉeĥoslovakujo, ĉiam varbante ankaŭ al E per provlecionoj. Li ekveturis la 14 jan. 1932 al granda prop. vojaĝo por sia patrujo tra Polujo, Danzig, Litovujo, Estonujo, Latvujo, Finnlando, Norvegujo, Svedujo kaj Danujo. Steiner vojaĝis 67 tagojn 12.843 ki'ometrojn, faris 46 paroladojn antaŭ 9500 personoj, parolis en 6 landoj antaŭ la mikrofono. Li estis subtenata de la aŭ. registaro kaj de ICK en Genève kaj ricevis registaran rekonon por sia laboro. Frey vojaĝis same kun ministeria subteno en 1930 al Svedujo, Norvegujo kaj Danujo, faris varb-paroladojn kun lumbildoj kaj filmoj, parolis per la radio ktp. Okazis ankaŭ reciproka propagando. Ekz. 3 junio 1930 Frey parolis per Radio-Wien kaj pli poste per 30 lumbild- kaj filmparoladojn en Wien pri la nordaj landoj. La ĉefparoladon ĉeestis la iama ŝtatprez. Hainisch, la tiama kaj la nuna kardinal-ĉefepiskopoj, Piff kaj Innitzer, kaj aliaj altranguloj.

Ĉefe fremdultrafikaj motivoj kaŭzis, ke E estis favore konsiderata ankaŭ ĉe la fervojoj. En 1925 la ĝeneraldirekcio de la fervojoj oficiale rekomendis (n-ro 33.037) la lernadon de E kaj permesis al la fervojistoj la portadon de la E-insigno ankaŭ dum la deĵoro. En 1926 estis aranĝitaj 6 kursoj por fervojistoj sub la gvido de Steiner; la partoprenantojn varbis Presselmayer kaj Panis. En 1928 la aŭ. fervojdirekcio proponis al la direktoroj

de la eŭropaj fervojoj aldonon al la int. funkci-regularo, laŭ kiu en la translimaj vagonoj ankaŭ E-surskriboj estu permesataj; la propono estis akceptata. En majo 1932 la direkcio eidonis reskripton, laŭ kiu sur rapid-vagonaroj povas deĵori nur konduktoroj, kiuj parolas fremdan lingvon; ankaŭ E estis menciata. La federaciaj fervojoj ĉiujare ekzamenigas siajn konduktorojn pri ilia lingvokono kaj ĝis 1933 193 faris ekzamenon pri E.

La favora akcepto de E flanke de la polico estas dankebla ankaŭ precipe al la fremdultrafikaj interesoj. La unuaj oficialaj permesoj okazis antaŭ la UK en 1924. En 1927 al la policistoj scipovantaj E-n estis permesata porti brakrubandon kun verda stelo, poste la polica prez. en Wien permesis portadi dum deĵoro sur la maldekstra brustflanko nikelumitan metalŝildon (3:10 cm.) kun la vorto E kaj la verda stelo; E estis enkondukata kiel nedeviga fako en la horaron de la polica lernejo pere de klopodoj de Steiner, kiu fariĝis ankaŭ instruisto; en 1932 la E-kursoj partoprenis ankaŭ 6 ĉinaj polic-oficiroj. Poste ankaŭ en Graz, Linz kaj Salzburg la policistoj, kiuj parolas E-n, portis la E-ŝildeton. Kurso de E en 1928 okazis ankaŭ ĉe la ĝendarma taĉmento en Wien.

Ankaŭ la radio apartenas al la terenoj, kie E akiris fortikan bazon. La unuan fojon oni parolis per radio en E dum la 16-a UK 1924 el la tiama Teknologia Metia Muzeo. En apr. 1925 E-kurso estis enkondukata en Radio-Wien, kiun gvidis ing. Hartwich, de sept. 1925 W. Smital gvidis la duan E-kurson. De okt. 1927 el Radio-Wien ne plu estas kursoj, sed ĉiusemajne dum 10 minutoj E-varbado por Aŭ. La 18 okt. 1933 je instigo de Steiner komenciĝis disaŭdigoj el Radio-Wien ĉiun merkredon en la malfruvesperaj horoj por la eksterlando. La celo estas, diskonigi sciindaĵojn pri Aŭ. kaj la oficialaj instancoj disponigas la koncernajn artikolojn.

La gazetaro estis same favora al E. Ekz. la gazeto »Kleines Volksblatt«, Wien, en 1920 aranĝis konkurson pri la plej bona E-traduko de la Aŭ. Liĝohimno; la unuan premion (100 ŝ.) ricevis prof. Ellinger. La sama gazeto

en 1933 enkondukis E-kurson kaj aperigis ĉiusemajne E-rubrikon. La taggazeto »Volks-Zeitung«, Wien (250.000 abonantoj) dum du jaroj (1930—31) havis E-kurson kaj ĉiusemajne E-rubrikon.

Krom kursoj efemeraj aŭ nur kelkjaraj en tiu aŭ alia lernejo troviĝis ankaŭ rimarkindaj iniciatoj. Baldaŭ post la milito (18. jan. 1920) la tiama estro de la publika instruado, Glöckel, informis la E-unuiĝon de instruistoj, ke la lernantoj de mezaj lernejoj kaj de la supraj klasoj de popollernejoj povas viziti la E-kursojn. La agado de la instruista unuiĝo kaj la sukcesoj de la kursoj konvinkis la registaron krei ŝtatan ekzamenan komitaton por instruistoj de E. La iniciato apartenis al la komunumo Wien, sed la ŝtato ne nur konsentis, sed ankaŭ alprenis la tutan regularon kaj egaligis la komitaton al la aliaj lingvaj ekzamenaj komitatoj. (30 apr. 1925, nr-o 2.163.) Prez. fariĝis Fr. Wollmann, membro A. Macho, Joh. Schröder, J. Schamaneh, H. Jokl, Fr. Meštan, kaj O. Simon. En la unuaj jaroj okazis multaj ekzamenoj kaj la komunumo Wien enkondukis E-n kiel nedeviga fako anstataŭ la franca lingvo en arondaj burĝlernejoj en Wien por la lerneja jaro 1926—27; la lingvo estis instruata ankaŭ en aliaj lernejoj. La oficiala lernolibro, liverita senpage al la lernantoj de la komunumo, estis Casari-Scheibenreiter: Lernolibro laŭ moderna, rekta metodo. Sed la ekonomia situacio devigis la komunumon ĉesigi multajn fakojn, inter ili ankaŭ E-n. Ekde tiam la interesiĝo ankaŭ por la ekzameno silentiĝis. En la lastaj jaroj okazis kursoj en Wien nur en kelkaj lernejoj per la memofero de la instruistoj. La ministerio por instruado mem en jun. 1929 permesis, ke E povas esti instruata kiel nedeviga fako en la mezlernejoj kiel la latina, greka, angla, franca, itala kaj slovena lingvoj.

Oni gvidis kursojn ankaŭ en iaj provincaj lernejoj. Ekz. lerneja konsilantaro de Graz en 1929 enkondukis E-n en la mezlernejoj kaj ĉ. 300 lernantoj lernis tiam E-n kaj tiu ĉi urbo en 1930 ordonis, ke la lernej-direkciaj akcelu ĉe la gepatroj de la lernantoj la intereson por la E-instruado; en la

gimnazio Melk en 1930 22 abiturientoj ricevis en siaj atestoj notojn pri E; tio okazis ankaŭ en kelkaj aliaj lernejoj.

La reĝimsanĝo mem trafis la E-istojn en Aŭ. meze de grava laboro. En dec. 1933 komenciĝis la laboroj por prepari la Int. Konferencon en Wien kun la celo »konduki E-n en la lernejon kaj praktikon«. La prepara komitato konsistas el Fr. Ŭbelh r, H. Steiner kaj R. M. Frey kaj la konferenco okazos 20—24 majo 1934, kun helpo de oficialaj instancoj, en kunlaboro kun UEA kaj aliaj faktoroj.

Eminentuloj, kiuj helpas E-n.

Miklas Wilhelm, federacia prezidanto de Aŭ. Favore skribis pri E en 1927 estante tiam parlamenta prezidanto. Okaze de la inaŭguro de IEMW li akceptis en aŭdienco 60 E-istojn, malfermis la Muzeon, parolante ankaŭ en E. Vizitis IEMW 2 okt. 1930 kaj enskribis sin kiel unuan en »Oran Libron«.

Piffl (pifl) Friedrich Gustav, d-ro, kardinalo, prinĉefepiskopo; mortis en 1932. Dum jaroj li favoris E-n, vizitis diversajn E-aranĝojn, speciale en katolikaj randoj. Vizitis IEMW 10 jan. 1931.

Innitzer (inicer) Theodor, d-ro, kardinalo, prinĉefepiskopo. Jam de jaroj li favoras E-n, vizitis IEMW kaj ĉeestis E-aranĝojn. Enkondukis E-n en la episkopan seminarion.

Seipel (sajpel) Ignaz, d-ro, fama kanceliero, prelato; mortis en 1932. Li estis la unua eminentulo, kiu salutis la proponon pri IEMW kaj tuj konsentis helpi. Al li E saldas multon.

Schober (ŝober) Johann, d-ro, policprez. de Wien kaj poste kanceliero; mortis en 1932. Li estis granda amiko de E: kreis E-kursojn en la polica lernejo de Wien, ordonis E-insignojn por la deĵorantaj policistoj, kiuj scipovis E-n. Helpis IEMW akiri hejmon en Neue Hofburg, vizitis la Muzeon 8 febr. 1931.

Dollfus Engelbert, d-ro, kanceliero. Akceptis la hon. prez-econ de Int. Konferenco 1934 kaj la hon. membrecon de IEMW. Skribis belajn vortojn pri E.

Fey (faj) Emil, vickanceliero. In-

teresiĝis jam delonge pri E kaj helpis ofte. Bela eldiro pri E.

Buresch (bureŝ) Karl, d-ro, landestro, poste kanceliero, nun financministro. Nask. 12 okt. 1878 en Gross Enzersdorf. Jam de multaj jaroj li helpas E-n. Vizitis IEMW. Belaj eldiroj pri E.

Stockinger (ŝtokinger) Fritz, ministro por komerco. Nask. 22 sept. 1894 en Wien. Bonega eldiro pri la granda de la ministerio rekonita valoro de E.

Neustdter-Strmer (najŝteter-ŝtrmer) Odo, barono, ministro. Nask. 1885 en Laibach. Bonega eldiro pri E, (kiam li estis ŝtatestretario por fremdulfrakvento), per kiu li asertas, ke li ĉiam uzos E-n, la plej bonan varbilon, por la fremdultrafiko.

Streeruwitz (ŝtrevucic) Ernst, Ritter von, iama kanceliero, nun prez. de la komerca ĉambro en Wien. Ĉeestis la aŭdiencion de la E-istoj okaze de l' inaŭguro de IEMW, ktp.

Heinl (hajnl) Eduard, iama ministro por komerco, nun prez. de »Oficejo por metafavorigo« kaj prez. de Radio-Wien. Je ĉiu okazo estas preta helpi la progresigon de E. Bonega eldiro pri E.

Ŭbelh r Franz, d-ro, iama unua sekcia ĉefo en la kancelariejo. Nask. 30 dec. 1870 en Wien. Estis la »bona anĝelo« de la E-Muzeo, estas ano de ties Int. Hon. Komitato. Li ankaŭ lernis E-n kaj estas ano de la prepara komitato por Int. Konferenco 1934.

Bick (bik) Josef, d-ro fil., ĝen. direktoro de Nacia Biblioteko, univ. prof. ktp. Al li la E-istaro dankas, ke IEMW estis aligita al la mondfama N. B. Bonege parolis en la inaŭguro de IEMW.

Deinlein (dajnlajn) Erwin, inĝ., ministeria konsilanto en la ministerio por trafiko kaj komerco, sekcio por fremdulfrakvento, kiun li estras. En 1928 li ekuzis E-n kaj de tiam ĉiujare — laŭ la bonaj faritaj spertoj — li denove eldonas vere elegantajn, belaspektajn faldprospektojn. D. tuj montris sian simpation al la aranĝo de Int. Konferenco 1934.

Fuchs (fuŝs) Alfred, ministeria direktoro, sekcia ĉefo. Nask. 12 apr. 1876. En nobla maniero ĉiam subtenis

E-n. Kiel estro de la trafiko subtenis la eldonadon de la propagandiloj en E kaj ankaŭ unuavice ebligis la regulajn radiodisendadojn por la eksterlando en 1933.

J a r y Rudolf, d-ro, direktoro de la fervojoj federaciaj. Nask. 2 febr. 1884 en Wien. Jam kiel sekr. de la tiama ĝen. direktoro li multe helpis E-n. Preskaŭ ĉiuj sukcesoj de E ĉe la aŭ. fervojoj okazis laŭ liaj helpoj.

Propagandistoj, kiuj multe laboris por E (krom tiuj, kiuj havas apartan biografieton): D ü r s c h m i d Karl en Klagenfurt (katolika movado); G a i d o s c h Franz, polica inspektoro, estis prez. de Polica EL en Wien; G r ö s s i n g e r Richard, dentisto en Salzburg, multajn jarojn laboris fervore; H e e b e r Wilhelm d-ro, kortega konsilanto, nask. en 1873, estro de la senato de Viena E-Unio; H i r z Franz polica inspektoro en Wien, kun polica konsilanto Buxbaum kaj inspektoro Gaidosch li sukcesis, ke policistoj sciopovantaj E-n, ricevis oficialan E-insignon; M a i e r Hugo d-ro, helpanto en IEMW, nask. 25 sep. 1889 en Wizenitz (nun en Rumanujo), ŝtate ekzamenita E-instr.; M ü l l e r Otto, ofi.isto, prez. de EK Klagenfurt, laboris multe; N e d w i d Wolfgang, parohestro, prioro, iama prez. de Katolika UE, Wien, faris ofte la predikojn dum la E-diservoj; P a a r Fritz, prof. de komerca akademio en Wels, klopodis multe por E speciale inter instruistoj de komercaj lernejoj; P l a n k Georg, parohestro en Karlo-Preĝejo, Wien, nask. 20 dec. 1886 en Oberndorf (nun en ĈSR), E-isto de 1913, faris E-predikojn dum diservoj; R a f f Emma, pollingva aŭstrianino, en Wien, de pli ol 25 jaroj laboras por E, gvidis kursojn, honora membro de UEU; S c h o l z Franz d-ro, registara konsilanto, en Liesing ĉe Wien, longjara E-isto; S i k o r Karl Otto, industriisto en Wien, multe laboris en komercistaj rondoj kaj ĉe la Viena Foiro; S t a n k e Franz, komercisto en Krems ĉe Danubo, longjara prez. de loka EG; S t e g m ü l l e r Fritz, prez. de EG en Salzburg, bona prop-isto; T ü c h l e r Robert, episkopo de la malnov-katolika eklezio en Aŭ., lernis E-n ĉe Steiner kaj nun varbas en sia medio; U l-

brich Rudolf, poŝtovicisto en Mattinghofen, afergvidanto de AEA, multaj kursoj; W a g n l e i t n e r Anton, fervojisto, fondis E-grupon en Wels, kies estro li estas; W e b e r Gustav, instr. por stenografio kaj E, nask. 21 majo 1886 en Wien, kunlaboris en IEMW de la komenco kiel sola helpanto.

Noto. La artikolo estis kompilita laŭ la detala kronologia manuskripto de Hugo STEINER kun kelkaj kompletigoj kaj komentarioj de la redaktoro.

Laborista movado. Laŭ artikolo de J. F. J. en »La Socialisto« (1927, p. 23.) la lab. movado en Wien naskiĝis 1912, kiam oni fondis »Bohema E-Societo Frateco«, kiu konsistis nur el laboristoj kaj preskaŭ ĉiu membro apartenis al alia nacio. En aliaj partoj de la nuna Aŭ. antaŭ la milito, montriĝis nur etaj signoj de aparta lab. E-movado. Post la milito la plifortiĝo de la socialdemokratio en Aŭ., kaj ĉefe en Wien, (du trionoj de la loĝantaro socialistoj), multe favoris la disvastiĝon de E. Kvankam ne ĉiuj gvidantoj de tiu partio konsideris E-n grava socia faktoro, tamen E havis vastan terenon en la laboristaj medioj, kaj por parto de la sukcesoj oficialaj aŭ duonoficialaj oni ŝuldas al socialista influo.

En 1922 fondiĝis en Linz la Aŭstria Laborista Ligo, kies sidejo fariĝis post unu jaro Wien. En 1924 ĝi estis reorganizita kaj ricevis la nomon Aŭstria Lab. Ligo E-ista (ALLE). En 1924 fondiĝis samebla organizo, la Socialdemokrata E-Federacio de Aŭstrio (SE-FA), sed en 1927 ĝi kunfandiĝis kun ALLE kaj de tiu tempo la lab. E-movado montris konstantan kreskon. Ĝis 1933—34, pri kiu atestas la jenaj nombroj:

	1927	1930	1933
Grupoj	39	61	53
Anoj	948	1549	1729
Wien:			
Grupoj	18	22	20
Anoj	456	690	746
Provinco:			
Grupoj	21	39	33
Anoj	496	859	864

En la kursojaro 1926—27 ALLE aranĝis 69 kursojn kun 1630 partopre-

nantoj kaj 10 progresajn kursojn, en 1927—28 74 kursojn por 1840 personoj, en 1928—29 59 kursojn por 1176 personoj. En 1932 la enspezoj de la societo estis 10.293, la elspezoj 10.429, la prezo de la venditaj libroj 4.029 ŝilingoj.

La ideologio de la gvidado estis pure socialdemokrata, kaj ALLE estis efektiva kultura organizo de la partio. Mem la titolo de la oficiala organo »La Socialisto« esprimis la socialistan karakteron de ALLE. La gazeto estis fondata en 1926. Antaŭe, (de sept. 1924) la oficiala organo de ALLE estis »Arbeiter E-ist«, la lab. E-gazeto en Germanujo. De 1930 okazis reciproka servo: kiam tiu gazeto fariĝis komunismtendenca, la Socialista E-Asocio en Germanujo akceptis La Socialiston kiel oficialan organon.

Unua prez. de ALLE estis Oscar Zimmermann, poste Slezak, de 1925 ĝis 1932 la prez. estis Otto Simon, kies estreco en 1930—31 estis interrompata de unujara prez-eco de F. Jeiter. Redaktoroj de la Socialisto estis Martin Klein, Adalbert Klatil, Ferd. Seidl kaj Hans Weinhengst. La lasta gvidantaro de ALLE konsistis el prez. Alfred Berdan, vicprez. Franz Jonas (la vera animo de la asocio), kas. Rasztozky Stöckl kaj Kapp, sekr. Haagen, gvidanto de la instrufako Simon, prop. kaj gazetservo d-ro Grimme.

En febr. 1934 post la venko de la Heimwehr-movado la registaro nenigis ankaŭ la socialistan lab. E-movadon. Kuratoro de ALLE fariĝis N. Hovorka kiu volas revivigi la lab. E-grupojn en la kadro de Popolkleriga Institucio.

Aviado. H. Farman, la mondfama aviadisto, P. Painlevé, la ĵus mortinta franca politikisto, jam antaŭ longe estis amikoj de E. Archdeacon, pioniro de aerflugado, unu el la gvidantoj de la franca E movado. Sed prekaŭ ĉiuj aviadistoj spertas la necescon de komuna helplingvo. Kiel H. Farman diris, per aeroplano oni atingas dum kelkaj horoj aliajn landojn, sed kaŭzas multajn malagrablojn kaj tempoperdon la fakto, ke la aviadisto ne povas komprenigi sin kun la loĝantaro, kvankam ties servon oni ofte bezonas. La sekvaj

detaloj signas la iniciatojn sur tiu ĉi grava tereno. En 1909 en Int. Aviadista Ekspozicio en Frankfurt estis aranĝita speciala E informejo. Samjare la gazeto »L' Aéro« en Paris presis lecionojn de E kaj en 1911 ĝi ĉiusemajne enpresis artikolojn en E; la E-parton redaktis Rienzi. En 1911 Gaston Guillaume, prez. de E Sporta Unio, lernis aviadarton en la lernejo de Paulhan, por propagandi E-n inter aviadistoj. En Vladivostok oni enkondukis E-n en Societo de amatoroj por korespondado eksterlanda. En 1913 la »Sachsonia«, aerŝipo de Zepelin plenumis aerflugojn kun E-flago. En sept. 1925 ISAE prezentis al la III-a Int. Kongreso de Aera Navigado en Bruxelles, deziresprimon, subskribitan de la Aero-Klubo de Francujo kaj Hispanujo. »La kongreso, konsiderinte la gravajn servojn, kiujn farus al la aeronautiko la uzado de la helpa lingvo E en la int. rilatoj, decidis starigi Int. Komisionon komisiitan por defendi kaj proponi mezurojn ebligantajn la enkondukon kaj disvolvon de la uzado de E, kiel teknika lingvo de la aera navigado kaj petis s-rojn Torres y Quevedo, Paul Renard, Emilio Herrera, Henry Kapferer, E. Archdeacon, kaj M. Rollet de l'Isle starigi ĝin, aligante kompetentulojn, kiujn ili juĝos uti'aj.« En 1927 la gazeto »Les Ailes« presis regule informojn pri E. Samjare prof. Cart gvidis E kurson por anoj de Int. Ligo de Aviadistoj en Paris, kies prez. Clifford B. Harmon esprimis favoron al E. en La Movado. En turista konkurso por aeroplanoj, starigita en 1929 de »Aero Club de France« kaj akceptita de la federacioj de aera turismo de la ĉefaj eŭropaj ŝtatoj, E estis akceptita kune kun la germana kaj itala lingvoj. En 1930 dum la Aŭstria E Kongreso en Linz la aviadisto Vess Wanek ĉirkaŭflugis la urbon per aeroplano, sur kiu estis pentrita konvena prop. teksto.

I. ŠIRJAEV.

Avril Georges, verkista nomo (lia vera nomo: de Courmont), franca. Ĉefredaktoro de grava sudfranca ĵurnalo L' Eclair de Nice. Nask. 19 jan. 1874 en Cannes. Pri-

studas precipe demandojn literaturajn, muzikajn, belartajn. Talento plena gazetisto kaj paroladisto. Verkis francajn romanojn kaj diversajn broŝurojn. Havigis al E multajn sukcesojn, precipe en Sudfrancujo. Verkas multnombrajn artikolojn pri kaj en E, en sia ĵurnalo (ĉiusemajna rubriko) kaj aliaj gazetoj. Direktoro de la Gazeta Komisiono de ICK. De febr. 1934 red. de *N i a G a z e t o*.

Aymonier (emone) Camille, franco, prof. de liceo. Nask. 17 sept. 1866 en Boujailles (apud Besançon). Verkis dek francajn librojn kaj ankaŭ artikolojn pri literaturo kaj pri francaj verkistoj. De 1900 multe laboris por propagando de E per paroladoj, artikoloj kaj libroj. Teoriisto kaj talento plena gramatikisto, kies Metoda Kurso estas modelo. Skribis en diversaj E-aj gazetoj. Verkis: *Parolado pri E*, (1902) — (kun Grosjean-Maupin) *Cours méthodique d' E kaj modela traduko*, (3 vol), (1909—10). — *Autour de l' E*, (1912) — *Réponse à des criti-*

ques, (1909) — *Une langue vivante artificielle*, (1917) — *Histoire d'une Délégation*, (1915) — *Essai sur la dérivation comparée* (1921) — *l' E, langue première de l'enseignement*, (1925) — L. L. Zamenhof, (1918) — L. K, 1909, Akademiano 1932.

Azio. v. Ĉinujo, Filipinaj insuloj, Hinduĉinujo, Hindujo Brita, Hindujo Nederlanda, Irako, Japanujo, Koreujo, Palestino, Persujo, Sirio, Turkujo.

Azorin Izquierdo Francisko, hispano, arkitekto, urbkonsilisto de Cordoba, parlamenta deputito. Nask. 12 sep. 1885 en Monforte de Teruel. Akceptigis en kongreso de la socialdemokrata partio proponon favoran al E. Re prezentis tiun partion en la SAT-kongresoj en Göteborg kaj Stuttgart. Verkis lernolibron, 1924, kaj la gravan oklingvan vortaron: *Terminologio de la Arkitekturo*, kun 2000 desegnoj, la klariga lingvo estas E (1932).

B

Baart de la Faille Cornelis Jacob, nederlandano, d-ro de biologio, prof. de natursciencoj en gimnazio. Nask. 20 majo 1880 en Groningen. E-isto de 1901. Starigis en 1903 kun Romein k. a. la unuan vivpovan grupon en Nederlando (Utrecht). Kunverkis kontraŭ-Idan broŝuron en N lingvo.

Baas (bas) P. W., nederlandano, instr. Nask. 9 jun. 1894 en Winschoten. Prez. de LEEN okt. 1931 — okt. 1933, red. de N. E-isto jan. 1932 — okt. 1933.

Babiladoj de Bonhumora Zamenhofano. Verkis originale J. Sapir o, 1921, 44 p. »Tiuj prozaĵoj estas ankaŭ spritaj karikaturoj skizetoj pri niaj samideaneaj moroj. La stilo estas lerta, tre korekta.« (G. S. E. 1922, p: 28.)

Babiladoj pri la Radio, v. Fine mi komprenas la Radion.

Backheuser (bakoĵer) Edvardo, brazilano, d-ro, prof. ĉe la Politeknika Lernejo en Rio de Janeiro. Verkis pri geografio, geologio kaj naciaj demandoj. Kunfond. de BKE (1905) kaj BLE (1907), reprezentanto de la brazila registaro ĉe la 20-a UK. Prez. de la 8-a Brazila Kongreso de E. Kiel deputito ĉe la parlamento de ŝtato Rio de J., li prezentis leĝoprojekton favoran al E. Verkis prop. komedion, faris multajn paroladojn kaj plurajn kursojn. Akademiano.

Backman (bakman) G. Henrik, svedo, kuracgimnastikisto en Helsingborg. Nask. 4 apr. 1867, mortis 14 jul. 1928 en Ramlösa Brunn. Pioniro de E en Sved. Speciale en la kriza tempo de 1909 li nelacigeble agadis. Konstante gvidis kursojn kaj

prop-is ĉiumaniere. Prop. vojaĝo en Germanujo en 1909. Heroaj klopodoj por eldoni la gazeton E-Folket, 1911—12, aranĝo de la unua Skandinava Kongreso de E en Göteborg, 1918. Verkis 4 lernolibrojn, (la unuan en 1892), vortarojn S-E kaj E-S (1921, 1919), trad. La konscienco riproĉas de Strindberg, 1928.

Baena Nuno, (ps. Forgesito), brazilano, d-ro, mararmea kuracisto. Mortis 11 nov. 1922. Kunfond. kaj unua vicprez. de BKE, fond. kaj unua prez. de la E-grupoj »Norda Matena Stelo« (1909) kaj »Enerĝio« (1921), en Belém (Pará). Prez. de la 6-a Brazila Kongreso de E. Poeto kaj rakontisto, verkis Ama Stelaro, (originalaĵoj kaj tradukaĵoj).

Baff William Edward, usonano, patenta advokato. Nask. 20 majo 1888 en Newark (New Jersey). E-isto de 1905. Kunfondinto de EG en Worcester (Massachusetts), Washington (District of Columbia) kaj Los Angeles. Unua prez. de EG de Los Angeles.

Baggi de Araujo (baĝi di arauju) Irani, brazilano, bankoficistino. Sekr. de BLE kaj BKE. Laboris ĉe la organizado de la biblioteko de tiu klubo, kiu enhavas ĉ. 2000 volumojn.

Baggi de Araujo Jácome Martins, brazilano, supera juĝisto. Mortis 27 jan. 1912. Plej malnova E-isto en B. (1896). Prez. kaj fond. de la Petropolis EG.

Baghy (baĝi) Julio, hungaro, verkisto kaj E-instruisto, antaŭe aktoro. Nask. 13 jan. 1891 en Szeged; lia patro estis drama aktoro kaj la patrino teatra sulfloristino. Post liaj lerneĵaj studoj ankaŭ li fariĝis aktoro

kaj reĝisoro en diversaj teatroj. La milito rompis lian karieron kaj ses jarojn li devis pasiĝi for de sia patrujo en rusa militkaptiteco. Ankorau dum sia junaĝo multaj liaj poemoj kaj noveloj hungarlingvaj aperis en hungaraj gazetoj. En 1911 li konatiĝis kun E kaj ĝia »interna ideo« tuj forlogis ĝin. Lia ampleksa E-agado komenciĝis jam en la siberia militkaptitejo, kie li gvidis multajn kursojn por diversnacianoj. Alveninte al Hungarujo post la milito, li fariĝis unu el la ĉefaj gvidantoj de la E-movado: multaj diversgradaj kursoj, gvidado de E-Rondo Amika, arango de lit. vesperoj, ktp. Dum pluraj UK-j li estis aktoro (kaj reĝisoro) de la kongresaj teatraĵoj. Por la reorganizo de la int. E-movado el-laboris detalan proponon: Publika Letero (1931). B. agitis multe por plialtigi la spitan nivelon de la E-istaro; tion celis ankaŭ lia iniciato, laŭ kiu la naskiĝtago de Z fariĝis la tago de la E-a libro. Kiel Cseh-metoda instruisto en la lastaj jaroj li gvidis multajn kursojn en Estonujo, Latvujo, Nederlando, Francujo, ktp. B. kunlaboras al multaj E-gazetoj, kaj estis unu el la ĉefred. de LM (ĝis 1933). Liajn verkojn karakterizas la tendenco, kiun esprimas lia devizo: »Amo kreas pacon, Paco konservas homecon, Homeco estas pe'ej alta idealismo.« Liaj unuaj poemoj venis el rusa militkaptiteco; ili kaŭzis surprizon kaj ĝojon. Z kaj la antaŭmilitaj E-poetoj estis baritaj de la lingvo, kiu donis malmulte da eblecoj. Mem Z povis forgesigi la neperfektecon de la poezia lingvo, almenaŭ plejparte per sia sincera, nobla, arda sento, kiu kreskis super la formajojn. Sed, krom la eksperimentoj de Grabowski, neniu poeto volis, aŭ povis elperforti sin el la frua tradiciemo de la juna E poezio. Post la mondmilita apatio kun multobligita forto eksonis la individua, nova, melodiĉa poezio de B. Lia unua poemaro, la Preter la vivo (1922) montris novan vojon al la E poezio, la vorto, la rimo, la bildoj ricevas novan signifon kaj en la abundo de la novaj belajoj la leganto estas forŝorcita, ĉu temas pri individua temo, ĉu pri homaranismaj

pensoj. En lia verkaro eĉ la multe prikantitaj temoj aperas kun la efiko de la novo, ĉar la verkado estas lia bezono kaj li ĉiam trovas originalan formon en la esprimo de siaj sentoj. Felice li retrovas la asonancon, novajn formajn eblojn. En la dua poemvolumo, Pilgrimo (1926), lia talento plimaturigas, sed samtempe pli forte aperas lia patoso, kiu donas al lia poezio iom romantikisman aromon, sen, ke tio forigus nian intereson. La poemoj, troveblaj en la Migranta Plumo (1929) montras la serĉadon de novaj formoj. En la lasta poemvolumo La vagabondo kantas (1933) B. reiras al la klasika E lingvo kaj inter puritanaj kadroj li pruvas sian eksterordinaran versifaran ta'enton, sed kun kelkfoje sentebla influo de la hungara poezio. Kiel novelisto, (Dancu Mario-netoj (1927), Migranta Plumo, Printempo en la Aŭtuno, 1931) li prezentas sin, kiel batalanto por la paco, uzante kelkfoje nigrajn kolorojn, sed kelkfoje pintigitan krajonon de la satiristo. Sed en la laste citita longa novelo li desegnas per subtilaj pastelkoloroj, kun speciala ŝato de siaj figuroj, knabinon kaj knabon, kies burĝonan amon li prirakontas. Lia unua romano la Viktimoj (1926) estas romano el la militkaptita vivo; la sti'o, konstruo, interna ardo, humoro tiom ligas la leganton, ke, malgraŭ la neverŝajneco de la romantikaj figuroj, estas ne eble ne ŝati la romanon, ĉar la poeto scias la manieron kredigi al ni, kion li kredas. Lia plej signifa verko estas la vasta romano Hura (1930), kiu estas parte brila satiro de la homa socio kaj sociojano, parte utopio, kaj tiu parto paliĝas apud la majstra grimaco. En la Migranta Plumo ni trovas liajn dramprovojn. En la plej nova verkado (La vagabondo kantas; simplaj versoj; Verdaj Donkifotoj, romano kaj karikaturoj, 1933) B. ŝoviĝas ĉiam pli kaj pli al la satiro kaj li iĝas akra kaj forta kritikanto de la E-movado. Lia freŝdata verko: La teatra korbo (1934) enhavas rememoraĵojn jam ekde la infanaĝo kaj konfesojn pri la homo kaj verkisto;

ĝi kontribuas multajn interesajn detalojn ankaŭ al la E-ista kariero de B. L. K. de 1923, nun Akademiano. Du el liaj verkoj ricevis akademian premion. Multaj nove'oj kaj poemoj de li aperis en diversaj lingvoj: la Hura aperis en germana traduko, 1933. F. SZILAGYI.

Bagnulo (banjulo) Raffaele, italo, ĉefadvokato de la financa ŝtata juristaro en Bologna. Pioniro dum la fruaj tagoj de E en Napoli.

Bahaismo. Religia movado, devenanta el Persujo, multe persekutita sisteme. Antaŭulo: Báb, fondinto: Baha' u'llah, klariganto kaj disvastiganto: Abdul Baha, nuna gvidanto: ŝogi Effendi. Bahaismo instruas sendependan serĉadon de la vero, forlason de ĉiuj superstiĉoj kaj antaŭjuĝoj, unuecon de la homaro. Krom la religiaj principoj ĝi postulas universalan pacon, proklamas egalrajtecon de ambaŭ seksoj, limigon de la ekstremoj de riĉeco kaj malriĉeco, universalan edukadon, adoptadon de int. helplingvo. Abdul Baha en multaj siaj verkaĵoj kaj paroladoj montriĝis amiko de E. En siaj vojaĝoj tra Okcidento li plurfoje parolis antaŭ E-istoj kaj fervore kuraĝigadis ilin. En Edinburg 7. jan. 1913 Abdul Baha diris i. a.: »Ni ordonis al la bahaanoj en Oriento studi zorge tiun ĉi lingvon, kaj baldaŭ ĝi estos disvastigita tra la tuta Oriento.« La aktiva simpatio de la bahaanoj multe helpas la disvastigadon de E en la orientaj landoj. Personon, kiu lernas E-n, aŭ E-istan turiston oni ofte demandas tie, ĉu li estas bahaano. Dum la UK-j regule okazadas bahaaj fakkunvenoj, informantaj pri la bahaismo; la unua okazis dum la 17-a en Genève. Pri ĉiuj detaloj informas la verko Baha' u'llah kaj La Nova Epoko, verkita de Esslemont, trad. de Lidja Zamenhof, kaj la kvaronjara gazeto La Nova Tago, lastan tempon ne aperanta. LIDJA ZAMENHOF.

Baha' u'llah kaj la Nova Epoko. Verkis J. E. Esslemont, et la angla trad. Lidja Zamenhof. 1930, 192 p. Detala konatigo de la historio kaj instruoj de la Bahaismo, kun indekso de la temoj. Bona stilo.

Bafiteev Faik, tataro, sovetiano,

E-tradukisto de literaturaj el tataraj, kazakaj kaj baŝkire lingvoj. Nask. 1905. Kunlaboris en Sennacieca Revuo, La Nova Epoko kaj La Nova Etapo.

Bailey (bejli) Henry Thomas, anglo, stenografiisto. Nask. 23 marto 1869 en Portsmouth. E-isto de 1902; Faris paroladojn ĉe Stenografia Asocio; artikolojn en Steno-jurnaloj. Mankopiis La Batalo de P Vivo el Z-a ĵurnalo E-isto por posta presado. Dum multaj jaroj helpis Georgon Davidov fari lian faman kolekton de E ĵurnaloj. Membro dum ĉ. 28 jaroj de UEA, BEA, Londona EK.

Bailey (bejli) T. Grahame, irlandano, prof. Nask. 8. sep. 1872 en Ambala, Hindujo. 1895—1920 misiisto; de 1920 prof. ĉe la Londona Universitato. Verkis 9 librojn kaj multajn artikolojn pri hindaj lingvoj. Hon. prez. de Londona E-a Klubo. L. K. Estris Diservon de la 18-a kaj 22a UK.

Bailey (bejli) William, anglo muzikisto, ano de la E-ista Akademio. Nask. 24 dec. 1866 en Manchester. E-istiĝis en 1905 kaj de tiam li kunlaboris en The British E-ist, La E-a Instruisto, The E Monthly kaj Literaturo. Li kunlaboris en la E-A vortaro de Millidge kaj en la kontrolado de la Bibliaj tradukoj. Estas konata lia traduko de »Thought Power« (Penspotenco) de Anna Mills. Li profunde studis la verkojn de Z kaj ĝisoste sekvas ilin. Li estas »vivanta konkordanco« al la Z-a verkaro.

Baire (ber) Georges, franco, ing. en Boulogne-sur-Mer. De 1908 seninterrompe UEA-del. Vicprez. de la loka EG.

Baker (bejkr) Arthur Brooks, usonano, prelegisto kaj ĵurnalista. Nask. 17 aŭg. 1877 en Salem (Kansas). Fondis unuan E gazeton en Usono, La Amerika E-isto, okt. 1906. Verkis prop. broŝuron »Elements of E«, 1906; oni disdonis 100.000 e-rojn. En 1907 verkis lernolibron »American E Book«; 40.000 e-roj estis disdonitaj. Trad. en 1907 la Komunistan Manifeston. En 1911 vendis gazeton kaj librorajtojn al ges-roj Reed.

Balčiunas Ignas, litovo. Nask. 10 marto 1909 en Gataučiai. E-isto de 1923. Gvidas konstante kursojn. Estrano de LES kaj Kaunas-a ES.

Bálint Gábor, d-ro hungaro, univ. prof. de uralaltaj lingvoj. Nask. 13 marto 1844 en Szentkátolna, mortis 25 majo 1913 en Temesvár. Li parolis 21 lingvojn. La unua hungara pioniro de E. En 1897 li gvidis kurs-on por universitatoj en Kolozsvár kaj eldonis litografite la regulojn de E. Iniciatis kaj helpis la eldonon de la unua HE gramatiko.

Balkányi (balkánji) Pál, (ps. Vera Nurhom; P. B.), hungaro, bankoficisto. Nask. 11 marto 1894 en Budapest. De 1912 li laboras energie kaj tre diversflanke por E. En 1918 li fondis la Prop. Komitaton sub prez. de famaj hungaroj, samjare aranĝis E-an fakon en la B-a Milita Ekspozicio. De 1918 ĝis 1928 aranĝis ĉiujare E Standon ĉe la B-a Int. Foiro. 1918 kunhelpis revigliĝi HES, gvidis kursojn. Multon zorgis pri la gazetara prop. servo. La Int. Foiro kaj la Ĉefurba Fremduloficejo je lia iniciato uzas grandskale E-n. De 1929 organizis vigan movadon inter la skoltaj kun rimarkinda sukceso. Li reprezentis la B-an komercan ĉambron en la konferencoj de Venecia, Paris kaj Frankfurt, parolis eksterlande kaj en B. per radio E-e. Entute depost la milito la plej fervora H prop-isto. De 1922 ĉefdel. de UEA. Estis kunlaboranto de La Revuo. HDE k. a. Verkis kelkajn nove'ojn, eldonis la unuan libreton de Kalocsay (Mondo kaj Koro, 1921), ktp. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Ballard Charles William, anglo, kontisto. Nask. 12 jun. 1867 en Edgware, apud London. En lia kvina jaro la familio transloĝiĝis en Nov-Zelandon. Pioniro de stenografio. Dum la lastaj dudek jaroj li dediĉis semajne unu vesperon al E instruo de novuloj. Estis prez. de Komerca EK kaj ES en Melbourne, Red. de La Suda Kruco dum du aŭ tri jaroj, kunlaboris por aliaj gazetoj.

Balliman (baliman) Jean, franco, komercisto. Nask. 2 majo 1876 en Paris. Prez. de la vitrovendistoj en Francujo. Direktis gazeton Paris-E

ĝis 1914. En 1905 fondis sekcion komercan kun delegitoj en tuta Francujo, sed tiu provo montriĝis trofrua. Post la milito eldonis gazeton France-E. Direktas Asocion E et Commerce. Trad.: Francaj Poezioj 1922; Maître Pathelin, farso de la 15-a jarcento, 1922.

Banham (benem) Frank Reginald, (ps. Robo), anglo, korektisto. Nask. 11 apr. 1898 en Lowestoft, Anglujo. Alvenis Aŭstralion dec. 1914; akiris diplomon de BEA, 1926; surpris redaktorecon de La Suda Kruco en apr. 1929. Verkaj: originalaj kaj tradukitaj artikoloj kaj skizoj en LSK de okt. 1927. Lingvaj artikoloj en E gazetoj, prop. artikoloj en la taggazeto »The Age« (Melbourne). Edziĝis febr. 1931 kun Hilda Dawes, diplomito de BEA. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Bankakuloj, 9 marto 1926 en Berlin estis fondita Bankfaka E Grupo, kiu celis propagandon de E en bank-fakaj rondoĵoj kaj daŭran korespondadon kun eksterlandaj samfakanoj. 28 dec. 1926 ĝi fariĝis Bankfaka E Asocio Tutmonda kies unua jarkunveno estis 10 jan. 1928 en Berlin. Adreso de la prez.: Karl Fischer, Friedrichsruher Str. 3, Berlin-Halensee. Pri efektiva funkcio de BEAT lastatempe mankas informoj.

Banner Lucien, franco, bankoficisto. Nask. 12 jan. 1893 en Damvillers. Lernis E-n tute sola en 1906 Soldatiĝis kaj revenis kripla en 1915. En 1918 gvidis kurson en Paris, kaj konatiĝis kun Lanti kaj Glodeau, kun ili k. a. restarigis »Liberiga Stelo«-n kaj poste kunfondis SAT. Estas ties ĝen. sekr. ĝis nun kaj faris en tiu funkcio multe da laboro. Iniciatis la eldonon de Vortoj de Lanti kaj verkis por ĝi antaŭparolon.

Bánó Miklós (ps. Cuvi Lovostan), hungaro, d-ro, inĝeniero. Nask. 4 jan. 1890 en Miskolc. Perdís la vidpovon en 1915, sed ne ĉesis labori en teknikaj kaj stenografiaj movadoj de l' vidantoj. De 1911 E-isto. Prop-isto de La Verda Standardo. Post la milito animo de la E-movado inter hungaraj blinduloj, fondinto de blindula grupo de HES, akiris plurfoje permeson intense instrui E-n en

la blindullernejoj. Verkis lerno-libron, kritikojn, poemojn, ktp. Unua premio por originala poemo ĉe Katalunaj Floraj Ludoj. Lia edzino, Irén Antal, aktiva E-istino, kaj ŝia filineto trijara: Klara Varma, jam paroletas E-e. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Barabás (barabás) Ábel, hungaro, mezlerneja prof., verkisto. Nask. 19 aŭg. 1877 en Verespatak, mortis 1915. Aŭtoro de la unua Hungarata Gramatiko de E en 1898 (Kolozvár); verkis ankaŭ prop. artikolojn.

Baranyai Imre (ps. Emba), hungaro, pentrajaganto. Nask. 14 marto 1902 en Alap. Propagandas E-n en socialdemokratiaj rondoj. De 1931 sekr. de la lit. sekcio de SAT. Poemoj en SAT-organoj kaj HDE. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Barbaraj prozaĵoj. De Bertrana el la kataluna trad. Jaume Grau Casas. 1926, 59 p. »La verkisto kun preciza observkapablo pentras scenojn el la vivo de simplaj kamparanoj. La stilo de l' traduko estas bona.« (Totsche, L. M. 1932, p: 39.)

Barbusse (barbüs) Henri, franco, fama verkisto; pacifisto kaj komunisto. Nask. en 1874. Honora prez. de la 1-a SAT-kongreso, 1921. Amiko de la lab. E-movado. Artikolo en *Esta Laboristo*, 1921.

Barcelo Andreu (barselo) Juan hispano, infanteria kapitano. Nask. 7 jan. 1884 en Selanits, Baleares. Sekr. de EK Palma, fondinto de la grupoj »Lumo« kaj »Amikeco«. Del. de UEA. Cseh-instruisto, gvidis kursojn.

Barcelo Caimari (barselo kajmari) Francisco, hispano, advokato, urbkon-silanto, sekr. de komerca ĉambro. Nask. 14 nov. 1884 en Palma, Baleares. Politikisto, dum kelka tempo urbestro de Palma. Estrarano de EK Palma.

Barcelona. Urbo en Hispanujo, la ĉefurbo kataluna, 775.000 loĝantoj. — 5-a UK 6—11 sep. 1909, 1287 kongresanoj el 32 landoj; ĉefaj temoj: organizo de naciaj E-societoj, financoj, laboroj de la E-Akademio.

Bardoulet E., la unua pioniro de E en Nova Kaledonio. Aliĝis al E en 1898. Vigla prop. precipe per artikoloj en Numea. S.

Bareluloj kaj Fadenuloj. Moderna fabelo por ge (mal) junuloj, de Maurois, el la franca trad. Berno Fabo. 1933, 105 p. Satira historio de du subteraj popoloj, kiuj pro bagatelo malpacas. Multaj tutpaĝaj ilustraĵoj.

Barni Giovanni, italo, teknikisto. Nask. 7 apr. 1889 en Verona kaj loĝas en Genova. E-isto de 1912. Kunfondis en 1913 »Laboristan E-Grupon«. Tiu grupo eldonis la *Devoj de la Homo de Mazzini*. Li estis preskaŭ ĉiam prez. de tiu grupo kaj gvidis multajn kursojn. Prof. de E.

Barrett John, usonano, diplomato. Nask. 28 nov. 1866, en Grafton (Vermont). Direktoro Generala de Panamerika Unuiĝo 1907—20. Prez. de EANA 1910—12. Prez. de UK en Washington, 1910. Aŭtoro de diversaj libroj, precipe pri panamerikaj interrilatoj.

Bartel Karl, aŭstrianano, germano, industria oficisto. Nask. 5 febr. 1892 en Graz. E-isto de 1907. Kunfondis int. klubon »Junaj E-istoj«, gvidis multajn kursojn, iniciatis 1920 »E-helpon por Aŭ. infanoj«: Hispanujo gatis 324 infanojn dum unu jaro. Trad. en *La Semajno*; *La Marto*; *Scienca Gazeto*.

Barthelmess Norbert, germano, ĵurnalisto. Nask. 19 febr. 1897 en Düsseldorf. E-isto de 1911. Trad. artikolojn en E de UEA, 1912—13. Gvidis kursojn en lab. grupo en Düsseldorf, 1922—24. Partoprenis multajn SAT-kongresojn kaj en kelkaj funkciis kiel ĉefpro-okolanto. Red. de *Sennaciulo*, 1924—25 kaj de 1928 ĝis nun. Ankaŭ red. de *La Nova Epoko* de 1930 kaj de *La Lernanto*. Trad. *Fausto* de Goethe, I. parto, 1923. Verkis la rakonton *Diblando* kaj parte la kursan lerno-libron por laboristoj *Petro* (1925, de li reverkita 5-a eldono en 1932). Kompilis: *Proletaria Kantaro* (1924) kaj *Unua Legolibro*, 1932. Li verkis poemojn, rakontojn, kiuj aperis en SAT-organoj. Larĝaj horizontoj, sociaj kontrastoj. Li preferas la temojn pri infanoj, penetras en la infanan animon, kaj kondukas la leganton en la ĉarman, petolan, tamen preskaŭ ĉiam nubombran mondon de la malriĉaj prolet-infanoj. EMBA.

Bartošik Dolfa, ĉeĥo, instr., grafi-kisto kaj desegnisto. Nask 1 majo 1907 en Boršice. E-isto de 1926. Unua prop. en Kromeriz inter gestudentoj, rezulto 2 kursoj en YMCA. Fondis Slovaka EK en Uh. Hradište. Gvidis Cseh-metodajn kursojn. Publikaj prelegoj en eksterlando. Kunlaboranto de *Ligilo*.

Bárh František, ĉeĥo, komercisto en Bratislava. Nask. 14 okt. 1884 en Praha. Tie li estis pioniro de 1900: unuaj informaj artikoloj en la tieaj ĵurnaloj; kunfondo de EK. Multon vojaĝis, vivis multajn jarojn ekster sia patrujo. En Sofia kunlaboris kun G. Atanasof. Dumviva membro de Leningrada ES.

Basic English. (bejsik ingliš). Simpligita formo de la angla lingvo, kompilita de C. K. Ogden, 1932 kaj propaganda ĉa ankaŭ kiel int. lingvo. La vorto »Basic« formiĝis el la unuaj literoj de la vortoj »British, American, Scientific, International, Commercial«. La bazo de la sistemo estas 850 zorge elektitaj anglaj vortoj, inter ili 18 verboj, 600 substantivoj, ktp. Verbojn, substantivojn ktp., por kiuj mankas vorto en la sistemo, oni devas esprimi per anstataŭigo, parafrazo, difino aŭ analizo. (Kritiko de B. E. en la 50-a kaj 51-a n-roj de HDE, 1933, de M. C. Butler.)

Bässler (besler) Otto germano, pre-seja laboristo en Leipzig; proks. 40-jara. Direktis la SAT-gazetservon de 1925—30, poste ekŝiĝis el SAT kaj aliĝis al IPE, laboris por PEK. Edzino ankaŭ E-istino.

Bastien (bastjen) Louis, franco, intendanto-generalo. Nask. 21 dec. 1869 en Obernal (apud Strasbourg). E-isto de 1902. Sin okupis multe pri la propagando en norda Francujo, kaj poste en orienta. Post pensioniĝo li rekomencis plej ageme labori. Depost kvin jaroj, li fariĝis, kiel vic-prez. de SFPE, unu el la plej sindonemaj prop-istoj en F. Li multe klopodis por la nova int. organizo de la E-movado. Verkis: *Naŭlingva Etimologia Leksikono*, 1907. Trad. de Bossuet, *Funebra Parolado de Princlo de Condé*, 1911. Kunmetis poŝvortareton por francoj, 1932. LK, 1909, kaj prez.

de la sekcio de la Teknikaj Vortaroj. Ĉefkunlaboranto de la *Enciklopedio*.

Batalo pri la domo Heikkilä. De J. Linnankoski, el la finna trad. *Setälä*. 1919, 60 p. »Kontrasto inter fortaj ideoj kaj virineca sentemo. Unu el la perloj de 1^a Finna literaturo.« (Laŭ la tradukinto.)

Batta József, hungaro, fertornisto. Estis sekr. de HESL, red. de *Munkáskultúra*. En 1926 politika elmigrinto el Hungarujo, poste kunlaboranto en SAT-organoj. Unu el la gvidantoj de IPE kaj red. de *Internaciisto* ĝis 1933.

Baudet (bode) André, franco, inĝeniero-industriisto. Nask. 18 apr. 1876 en Paris. Eminentulo en la komercaj rondoj, en kaj ekster Francujo. Prezidinto de multaj komercaj oficialaj societoj. Prezidis la Parizan Komercan Cambron dum 4 jaroj, kaj la kunvenon de la Komercaj Cambroj. En 1921, komisiita por raporti al la Komerca Cambro de Paris pri utileco kaj elekto de int. helplingvo, li komencis sian studon skeptike, sed rapide fariĝis konvinkoplena E-isto, penetrigis la lingvon en la komercon en kaj ekster Francujo, E-igis multajn komercajn ĉambrojn. Delegito de la Pariza Komerca Cambro al la Kongresoj de Genève (1922), Venezia (1923), Paris (1925). Fondis kaj prezidas la Asocion E kaj Komerc. Al li E dankas siajn progresojn en la komercaj rondoj de Francujo. Verkis broŝurojn pri E kaj Komerc, rimarkindan paroladon kun kurso de E en unu horkvarono, kaj *La komercantaŭ kaj postcent jaroj prelego farita ĉe la 24-a UK*.

L. BASTIEN.

Baudouin de Courtenay (boduen de kurtnej) Jan Micislaw, polo, devenanta el franca familio, univ. prof. Nask. 3 marto 1845 en Radzymin apud Warszawa, mortis 3 nov. 1929 en W. Eminentulo lingvisto, ano de la Pola Akademio. Aktiva liberpensulo, prez. de la Pola Asocio. Kuraĝa defendanto de la interesoj de ĉiuj naciaj malplimultoj. Varma amiko de E, multaj artikoloj en la E kaj pola gazetar, multaj paroladoj. Kiel vicprez.

de la Delegitaro en 1907 defendis tie E-n kontraŭ aliaj projektoj.

Baxter (bakster) James G., skoto, asekuristo. Nask. 30 jan. 1865 en Liverpool. UEA-ano n-ro 1030. Red. kaj eld. grupan gazeton *Nia Propra*. Speciala ekzamenisto por BEA.

Bayol (ba'jo), franco, oficiro. Nask. 20 jan. 1871 en Lille, mortigita en la milito 1915. Konata pro sia propagando ĉe la Ruĝ-Krucaj Societoj, al kiuj li faris multajn paroladojn en tuta Francujo. Fondis la societion *Croix-Rouge* (1905), kaj redaktis ĝian bultenon. Verkis: *E kaj Croix-Rouge*, trad. en sep lingvoj.

BEA: Brita E-Asocio, v. Britujo.

BEA: Bulgara E-Asocio, v. Bulgario.

BEAT: Bankfaka E-Asocio Tutmonda, v. Bankfakuloj.

Beauchemin (boŝmen) A P., franca kanadano, pioniro de E en Kanado. Fondis grupon »La Lumo« en 1901; red. de gazeto *La Lumo*. Iama L. K.

Beaufront (bofron) Louis de, franco, prof. Nask. 3 okt. 1855 en Paris. Ĉe liaj studadoj lingvistikaj li ricevis konsilojn, eĉ lecionojn de Max Müller mem kaj tio faciligis pli malfrue al B. ricevi de tiu granda lingvisto laŭdan mencion pri E. Li ankaŭ studis speciale la Dominikanan filozofion, kiu kondukis lin al la teologio; li ricevis doktorecon pri teologio, sed fakte estis nek monaĥo, nek sacerdoto. Vojaĝante en Hindujo kaj en aliaj landoj, B. spertis mem neĝustecon de la aserto, ke oni povas kompreni ĉiuloke per la franca kaj angla lingvoj, sed B. ja komprenis ankaŭ la germanan, hispanan, italan, hungaran kaj araban lingvojn. Tiu fakto inspiris al B. (18-jara) la rimarkon, ke la vortoj »tabako«, »teatro« k. a. kompreniĝas internacie malgraŭ forma'aj diferencetoj, kaj tio kondukis lin al ideo pri artefarebla lingvo int. Fariginte privata instruisto ĉe amikoj en 1877 post financa katastrofo kaj gravegata tifo, li provis realigi L. I. per sistemo, kiun li nomis »A d j u v a n t o«, sed la manuskripto, deponita ĉe notario, malaperis (laŭdire pro detruo

aŭ ŝtelo.) B. estis la unua franca E-isto, aliĝis al E jam en 1888, kaj tuj komencis propagandi en la regiono de Toulouse kaj Albi. B. eldonis en jan. 1892, laŭ la rusa lingvo, la unuan lernolibron por francoj. Fondis en jan. 1898 la revuon *L' E-iste* kaj SPPE, kiu elvokis en Francujo la fondiĝadon de la unuaj grupoj kaj la organizon de instruado, pri E. Ekde la fondo prezidis tiun societion; ekzistis en 1908. Li la unua ellaboris plenan gramatikon de E, klarigante la manieron por esprimi en bonstila E la naciajn parolturnojn, kaj tiamaniere evitante la danĝeron de naciaj dialektoj en E mem. En la daŭro de kelkaj jaroj (1892—1905) li eldonis tutan serion da lernolibroj, ekzercaroj vortaroj, i. a. la faman *Commentaire sur la grammaire E*, 1900; kaj plie *Pregareto por katolikoj* 1893; verkis prop. librojn; la unua aperis en 1895. B. aliris al E multajn eminentajn kaj influajn personojn kaj diversajn asociojn. En 1894 B. estis kontraŭ reformoj en E. En 1908 li anonime prezentis al la »Delegitaro« (v.) sian projekton de reformoj en E sub ps. Ido. Tio okazigis la »skismon«. B. mem fariĝis ĉefa gvidanto de la Idomovado.

Beaume (bomel) Léon, franco, hospitala administranto. Nask. 8 sept. 1870 en Toulouse. Interesiĝas pri »Ligo por Instruado« kaj ĉiuj manifestiĝoj de arto. E-iĝis en 1902. Publikaj kursoj kaj artikoloj. Vicprez. de SFPE.

Becker (beker) Eduard, germano, katolika pastro, eklezia konsilisto. Nask. 10 okt. 1867 en Mokrane; mortis 2 okt. 1930. Agis por E ĉe la sendstacio Breslau, per kiu li ofte parolis kaj instruis. La modesta viro estis unu el la plej eminentaj pioniroj de E en Silezio.

Bedekovič Danica, kroatino. Pioniro en Kroatujo (Jugoslavujo) de 1905. Ŝi redaktis la unuan E-gazeton en la lando Kroata E-isto, verkis la unuan plenan lernolibron por kroatoj, 1909, kaj E-K Vortaron. S.

Behrendt (berent) Arnold, germano, poŝtkonsilisto. Nask. 29 apr. 1877. E-isto de 1908. Prez., depost la

»samdirektigo« gvidanto de GEA ; prez. de la 25-a UK en Köln. Lia prop. agado estis la kutima: paroladoj, artikoloj kaj instruado. Lia laboro per E rilatas unuavice lian profesion: fakaj artikoloj en la iam eldonita de li Poŝta E-isto informis la anojn de ILDEPO (prezidita de li 1911—14) pri diversaj fakaj aferoj. Dum la milito li kunlaboris en Int. Bulteno, tradukis multajn paroladojn ktp. de germanaj ŝtatistoj, broŝurojn pri la milito, ŝtatistikon k. s. Post la milito li tradukis kelkajn broŝurojn pri Supera-Silezio kaj eldonis komence de 1923 unu kajeron Germanlanda Bulteno pro la invado en la germanan Ruhr-teritorion. Verkis kelkajn lernolibrojn de E, inter ili lernolibron por poŝt- kaj telegraficistoj. La studado naskis multajn artikolojn prilingvajn por E-Praktiko kaj G. E-isto. En LK de 1911. En iama Revuo aperis liaj unuaj poemoj; poste E-Praktiko publikigis poemojn kaj prozaĵojn de li. Entute: grandega laboro por kaj per E. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Bein, Kazimierz, v. Kabe.

Bel Henri, franco, bibliotekestro ĉe la Universitato en Montpellier. Unu el la kunfondintoj de SFPE, 1898 kaj el la unuaj propagandistoj per artikoloj kaj paroladoj; kunfondis kaj prezidis la grupon de Montpellier, 1902.

Beŭa Joe, aŭtobiografio de hundo, verkis Marshall Saunders, el la angla trad. J. Blaikie kaj N. Hohlov. 1929, 310 p., kun ilustraĵoj. »Beŭa Joe estis reala hundo. Dum la unua parto de sia vivo »li« apartenis al kruela mastro. Poste li vivis multajn jarojn en feliĉa hejmo.« (El la Antaŭparolo.)

Belga Antologio. Flandra parto. Kompilita kaj kun literatura resumo de Vermuyten. Franca parto. Komp. kaj kun lit. resumo de Jaumotte. 1928, 285 kaj 285 p. Specimenoj kaj biografiaj notoj de ĉ. 100 aŭtoroj. »Ega laboro de seriozaj kaj kapablaj personoj, kolektiva penado, ampleksaj konoj, persistemo kaj kuraĝo. La tradukoj estas bonaj,

parte eĉ tre bonaj.« (Butin, HDE' 1930, n-ro 11.)

Belga Esperantisto. Organo de BLE, fondita en 1908; formato 24×16. Redaktis: L. Champy, Van Laere, Van Der Biest-Andelhof, Oscar Van Schoor, Frans Schoofs.

Belgujo. La unua belga E-isto estis Armand Dethier, dir. de »L' Annonce Timbrologique«, revuo en kiu li, proks. komence de 1892, publikigis artikolojn pri E, en kiuj li akcentis speciale la utilecon de E por kolektantoj de poŝtmarkoj.

En la fino de 1897 leŭtenanto (poste kapitano) Charles Lemaire, la konata Kongolanda esploristo belga, konatiĝis kun la ideo de L. I. kaj kun E, kaj ambaŭ trafis tiel forte lian spiriton, ke li tuj decidis ilin ekpropagandi en Belgujo, kie tamen ekzistis jam kelkaj izolitaj sed neagemaj E-istoj, kiel li tion poste diris en la de li fondita gazeto — lia proprajo — Belga Sonorilo.

Li publikigis serion de ok artikoloj pri la demando en la tiama belga gazeto ĉiutaga »Le Petit Bleu«. Tiuj artikoloj estas kunigitaj en broŝuro 1898, kiu ne estis vendota, sed senpage disdonata de Multlingvaj Rondoĵoj aŭ scienculaj Societoj. La Poliglota Rondo de Bruselo estis ĝia deponejo. La eldonon ebligis diversaj riĉaj scienculoj belgaj, inter kiuj estas citeblaj Somsée, Solvay, Lambert, k. c.

Samtempe Lemaire, honora membro de l' Poliglota Klubo de Bruselo, donis en ĝi du prop. paroladojn (dec. 1897, jan. 1898). Ili estis sekvataj de unua kurso pri E donita en tiu klubo de P. B. L. a. n. Baldaŭ alia kurso estis organizata en Gilly apud Charleroi, de Roelandt.

Post kelka tempo Lemaire devis foriri por esplora vojaĝo en Afriko, kaj post la reveno, li konstatis, ke ekzistas kelkaj E-grupoj en diversaj lokoj, kies membroj ja tre akurate kunvenas, sed kiuj estas tute neagemaj je prop. vidpunkto. Li do rekomencis la batalon kaj faris paroladojn en diversaj urboj — nome en Gent'o, en la Universitato. Novaj kursoj estis organizataj, inter aliaj en la societo »Vastigado de la Lernejo por Instruistoj« kaj en la »Antverpena sekcio de

la Federacio de la lernantoj de l' Belgaj Atenceoj. Tiu lasta kurso okazis en la ejo de l' Reĝa Atenceo de Antverpeno, kaj por ĝin sekvi la lernantoj devis sin turni al Skabeno Desguin. Gvidanto de l' kurso estis Lucien Blanchean (okt. 1902). Aliparte, leŭtenanto Léopold Jamin, frato de arĥitekturo Joseph Jamin, en Bruselo, ekdonis kurson en la Antverpena »Taverne Royale«.

Baldaŭ aliaj paroladistoj ekpropagandis la lingvon en diversaj lokoj: en Bruĝo, A. J. Witteryck, presisto, kiu eldonis tiutempe ĉiusemajnan ilustritan revuon flandralingvan »De Lusthof« kun rubriko E-a; en Loveno, de Mattelaer, tiutempe studento en la tiam Universitato; en Antverpeno, de ĥemia doktoro Raymond Van Melckebeke, nome en la »Centra Societo de l' Belgaj ĥemiistoj« k. c.

Aliparte multaj el la ĉefaj gazetoj belgaj kaj aliaj malpli gravaj revuetoj kaj revuoj, tiom el la Flandra kiom el la Valona parto de l' lando, ekparolis pri la lingvo, kaj poste enhavis ofte artikolojn ĉu favorajn ĉu kontraŭbatalajn pri la demando. Ni citu: Le Matin, La Métropole, Het Handelsblad (Antverpeno), Le Courrier de l' Orneau, Zuid — — Noord Nederlandsch Tooneel; Le Journal de Courtrai; De Limburger; Klim op (Lovenjo); La Meuse, Le Journal de Liège (Lieĝo); Le Soir, Le XX-e Siècle, Le Patriote, La Chronique L'Indépendance Belge (Bruselo); Le Bien Public, La Flandre Libérale (Gento), k. c.

Tiu agado multe vastigis la ideon kaj pligrandigis la nombron de l' adeptoj de la lingvo int. Kursoj ekdoniĝis; naŭ Asocioj sciencaj nomis delegitojn en la »Delegitaro«.

En sept. 1902 Lemaire fondis sian monatan revuon La Belgia Sonorilo, kies ĉefred. estis Joseph Jamin, cenzuristoj P. kaj L. Blanchean, adm. Maurice Seynaeve (tiam studento en la Genta Universitato), presisto A. J. Witteryck, Delplace; kunlaboris Gaston Chotiau, L. Cogen, L. Jamin, k. c. La apero de tiu revuo okazigis la kreon de E-istaj Grupoj en diversaj urboj kaj aliaj komunumoj: La Antverpena Grupo E-ista estas fondita en marto 1903 kun 50 membroj. Sekvis:

la E-ista Katolik-Universitata Grupo (fonda kunveno 17 marto en la Cambrégo de l' Universitato mem) kun pli ol 50 membroj (fondinto: Mattelaer); la Studenta Grupo en Gento (majo 1903; fondintoj: M. Seynaeve kaj Cauterman); La E Sekcio de l' Poliglota Klubo de Bruselo; la Lovena Grupo (7 majo, fondintoj: Eug. Mathys, filo, Advokato Van Dieren kaj Paul Blaise); la Bruĝa Grupo (fondinto: A. J. Witteryck); la E Sekcio de la Popola Universitato en Saint Gilles-Bruxelles; la Grupo en Lieĝo (fondinto: Oudenne); la Grupo en Gilly (fondinto: Rodeland); la Grupoj en Mehleno, Duffel, Huy, Verviers, Andenne; poste, en 1907, la Brusela »La Pioniro«; k. c.

Multe favoris la propagandon la kvar paroladoj faritaj de prof. Lambert (de la Universitato de Dijon. Francujo) en la kvar belgaj universitatoj de Gento, Loveno, Bruselo kaj Lieĝo, en nov. 1903, laŭ iniciato de Maurice Seynaeve. Citindaj faktoj el la tiam propagando estas la grava partopreno de E en la Ekspozicio geografia organizita de la Reĝa Societo de Geografio en Antverpeno dum la somero 1902 kaj en la ekspozicio de fotografaj organizita ankaŭ en Antverpeno, de la »Societo por fotografaj kaj sciencaj lernadoj«, dum aŭg. 1903.

Tiuj multnombraj klopodoj kondukis, en 1905, al la fondo de Belgia Ligo Esperantista (BLE), 30 julio. Jen en kiaj cirkonstancoj, laŭ la raporto de Seynaeve en »Belga Sonorilo« de sept., 1905:

»Ĉirkaŭe je la lastaj tagoj de majo 1905, presita letero, subskribita de Sroj L. Blanchean, J. Coox, E. de Troyer, J. Jamin, E. Matys, Dro Seynaeve, kaj Dro R. Van Melckebeke, estis sendata al ĉiuj plej konataj belgaj E-istoj kaj petis ilin bonvoli kunveni por kune decidi pri la rimedoj plibonigi la propagadon de E en Belgujo. Tiu kunveno okazis la 25 de junio, ĉe la sidejo de la Antverpena Grupo E-ista, en Antverpeno... Dum tiu kunveno oni ricepe decidis unuvoĉe fondi Ligon de la Belgaj E-istoj kaj oni komisiis Srojn Coox, Seynaeve kaj Van Melckebeke por la elverko de projekto de regularo.

»La 30 de julio, dua kunveno okazis.

en Antverpeno. Ĉeestis en ĝi f-inoj Greiner, Daenen, Lecointe, s-roj Blanche, J. Jamin, Vandersleyen, Verbanck (Bruselo); Brahm, Champy, De Cae, de Roy, Dro Gunsburg, L. Jamin, Van de Kerckhove, A. Van der Biest-Andelhof, Dro R. Van Melckebeke (Antverpeno); L. Cogen (Gento), Coox (Duffel), Mathys (Lovenjo), Dro M. Seynaeve (Kortrijk), Sloutsky (Ligeo). Senkulpigis sin pri sia foresto E. De Troyer (Ligeo), Dro Goffin (Ostendo), Mourlon (Bruselo), Dro W. Van der Biest (Antverpeno), Van Oevelen (Zoersel), Witteryck (Bruĝo). Dum la kunveno, oni ricevis entuziasman telegramon de E. d' Artois (Bruselo). Sub la prezido de A. Van der Biest-Andelhof, la kunvenintoj longe diskutis kaj fine akceptis la regularon. Oni ankaŭ decidis, ke la unua jaro de la Ligo daŭros de tiu tago ĝis la 1-a de sept. 1906 kaj ke tiu kunveno povos anstataŭi la ĝeneralan ordinaran kunvenon se la Komitato tion opinias utila. Laŭ la ĵus akceptita regularo, oni devis tiam elekti la ses komitatojn, ĉiujare elektotajn de la ĝenerala kunveno. Post propono de Dro Maurice Seynaeve, oni aklamis komandanton Lemaire kiel membron de la komitato; post voĉdonado, la prez. proklamis kiel aliajn komitatojn f-inojn E. Lecointe, L. Blanche, J. Jamin, Dro Seynaeve kaj Dro Van Melckebeke.

Tiu komitato tuj eklaboris serioze kaj dum komitato kunsido okazinta la unuan de okt. 1905 en la loĝejo de komandanto Lemaire, en Bruselo, estis elektata la jena direktanta komitato: prez. komandanto Lemaire; ĝen. sekr. d-ro Seynaeve; adm. sekr. Coox; membroj f-ino Lecointe, L. Blanche, J. Jamin; d-ro Van Melckebeke, al kiuj estonte estis aldonataj L. Jamin, Van der Biest—Andelhof (kiu poste fariĝis vic-prez.

En 1905 la interna formo kaj divido de Belga Sonorilo estis tre taŭge ŝanĝata kaj plirarĝigata; ĝi publikigis de tiam ne nur prop. kaj movadajn artikolojn, sed ĉiuspacajn alitemajn komunikojn; Seynaeve fariĝis ĝia ĝenerala direktoro. Oni ankaŭ starigis la kondiĉojn por la akiro de la »Atesto pri Kapableco«, k. c.

Granda nombro de Delegitoj por la

»Delegitaro« estis akirita inter la societoj belgaj (sciencaj, komercaj k. a.) kaj grava petskribo estis organizata inter la univ. profesoroj favore je la alprenado de Lingvo Int., petskribo sendota al la sciencaj akademioj de la mondo: pli ol cent profesoroj subskriboj estis kunigitaj.

Tamen la reformemo ekfaris jam sian malbonan disigan agadon en Belgujo kiel alilande kaj Lemaire iom post iom entreprenis en sia Belga Sonorilo lingvistojn (titolitajn »At la int. helpa lingvo«), certe tre interesajn, sed danĝerajn por la lingva unueco, ĉar ili igis lin pli kaj pli forlasi la E-an formon por alpreni tiun de Ido: de 1908 ĝis 1914, kiam, pro la komenciĝo de la Mondmilito, Belga Sonorilo ĉesis definitive aperi, la gazeto fariĝis tute Idista, kaj ĉiuj ĉi-supre cititaj pioniroj de la movado en Belgujo, (esceptante Van der Biest-Andelhof kaj lian filon d-ron W. Van der Biest, Witteryck, Mattelaer, Paul Blaise, Champy, Roelandt, d-ron Goffin, d-ron Raymond Van Melckebeke, L. Cogen kaj kelkajn aliajn) sekvis Lemaire, kiu propramove forlasis BLE (ĝenerala kunveno de la 20-a de sept. 1908). Multaj honoraj komitatoj ankaŭ eksigis, aliaj restis, sed mortis en la sekvantaj jaroj.

Tiu reformema spirito naskis skismon en la Ligo kaj en nov.—dec. 1903 la fundamentideaj E-istoj belgaj fondis la monatan gazeton nun ankoraŭ ekzistantan Belga E-isto. En sia kunsido de la 25 okt. 1908 tiuj samaj »Fundamentuloj« elektis la jenan novan estraron de BLE: prez. Amatus Van der Biest-Andelhof; vicprez. A. J. Witteryck kaj abato Richardson; sekr. Leon Champy; kas. Oscar Van Schoor. Post la morto de Van der Biest (22 jan. 1912) Witteryck fariĝis prez.

En 1924 fariĝis prez. F. Schoofs kaj restis ĝis la morto en 1934. Witteryck fariĝis honora prez. La nuna komitato de BLE aspektas jene: vicprez. L. Cogen kaj P. Kempeneers; sekr. H. Petiau; kas. M. Jaumotte; adm. sekr. Poupeye kaj R. Dechesne. Jaumotte estas ankaŭ red. de BE. Konstantaj komitatoj: Babilon, Champy, S-ino Elworthy-Poseaer, d-ro W. Van der

Biest kaj Oscar Van Schoor. Inter la plej malnovaj aŭ plej laboremaj komitatanoj estas plie: s-roj De Ketele, De Fals, kaj Boffejon, s-inoj Thoris, Obozinski, Baiwir, Fr. Van Geuchten, Jos Leflot kaj L. Braet.

La nuna honora prezidanto estas la Reĝo Leopoldo III, kiu akceptis tiun titolon post la morto de generalo Graf von Leman.

La Ligo kalkulas dudekon da grupoj tre agemaj el kiuj »Verda Stelo« (Antverpeno) kaj la »Bruĝa Grupo« akiris la oficialan titolon »Reĝa Societo« (almenaŭ 25 jara ekzistado).

Belga E-Instituto, koopera societo fondita en Antwerpen por la eldono, presado kaj vendado de E-verkoj la 1 marto 1926. Hodiaŭ ĝia kapitalo atingas 160.000 belgajn frankojn (ĉ. 23.000 svfr.) kaj eldonis multajn gramatikojn, propagandojn, krome Belgan Antologiojn kaj Rimvortaron de Jaumotte. La unua administrantaro konsistis el s-roj Schoofs, Jaumotte, De Coster, De Ketele, Vermandere, Oscar Van Schoor, Van der Veken, De Hondt, Vermuyten kaj f-inoj De Buyser kaj Morrens. Post la morto de Schoofs (kiu estis la animo de BEI) faras la administron s-roj Boffejon, de Hondt kaj Vanderveken.

UEA en Belgujo. Ekzistas Belga Teritorio kun Fr. Schoofs kiel ĉefdelegito kaj multaj delegitoj en aro da urboj kaj aliaj komunumoj. Membro-nombro: proks. 300. Post la morto de Schoofs gvidas la UEA-aferojn De Ketele.

Du eksterlandaj laboristaj asocioj havas en B. apartan sektion. La franca FEO agadas en la franca parto de la lando, la nederlanda FLEN en la flamanda parto. Funkciis ankaŭ kelkaj fakaj E-societoj, ekz. en la postmilitaj jaroj la maristoj havis apartan E-grupon en Antwerpen, al kiu apartenis E-istoj el multaj naciaj; la gvidanto estis la hungaro J. Porcsin. Ankaŭ en aliaj urboj laboris kelkaj elmigrantoj.

Monda Palaco en Bruselo. Dank' al la klopodoj de Paul Otlet kaj senatano H. Lafontaine, direktoroj kaj kreintoj de la Monda Palaco, Ĝ. havas en ĝi specialan Cambron kie estas elmontrataj aro da dokumentoj:

libroj, gazetoj, propagandiloj, k. c. Post la Mondmilito la du direktoroj organizis dum diversaj jaroj intersekve »Universitatajn int. Semajno-duojn« en kiuj la »Profesoroj« rajtis uzi ĉiujn lingvojn laŭ sia bontrovo: E tie estis ankaŭ akceptata kaj kiversajn fojojn E-istoj-profesoroj donis tie paroladojn pri diversaj sciencaj objektoj.

Literaturo. Jam en 1904 aperis »Paĝoj el la Flandra literaturo« (v.). Post la milito »Belga Antologio« (v.). Multe laboris sur literatura kampo s-inoj Elworthy - Posenaer, Lucette Faes-Janssens, s-roj Jaumotte, Oscar Van Schoor kaj De Schutter.

Ni aldonu, ke la Publika Biblioteko de Antwerpen posedas tre gravan kolekton de ĉiuspecaj E-aj broŝuroj, libroj, revuoj.

En Radio-kampo estas citinde ke, tri kursoj pri E estis donitaj en »Radio-Belgique« (nun la ŝtata I. N. R.) dum tri intersekvaj vintroj. Profesoroj estis M. Somerling (en flandra lingvo), F. Mathieux, M. Jaumotte kaj P. Kempeneers (en franca lingvo). Dum pli ol unu jaro tiu lasta donis ĉiusabatajn paroladetojn en E. La sukceso de tiuj kursoj estis tre granda. En »Radio-Belgique« Kempeneers faris ankaŭ la 22 apr. 1929 gravan paroladon E-lingvan pri Belgujo, preparan al la centa datreveno de P' lando en 1930.

Kongresoj E-istaj, kiuj okazis en Belgujo:

1909, 27—28 junio en Verviers, 1-a landa k.

1910, 15—16 majo en Bruĝo 2-a landa k.

1910, 22—26 julio en Bruselo E-ista Semajno-Kongreso en la Mond-Ekspozicio (kun E-ista Oficejo kaj speciala ekspozicio).

1910, 26—30 aŭg. en Bruselo 2-a kongreso de UEA.

1911, 4—5 junio en Charleroi 3-a landa k.

1911, 20—27 aŭg. en Antverpeno 7-a UK.

1912, 26—27 majo en Gento 4-a landa k.

1913, 11—12 majo en Spaa 5-a landa k.

1913, 14—20 aŭg. en Gento Int. E-ista Semajno-Kongreso dum la Universala Ekspozicio.

1914, 31 majo—1 junio en Mehleno 6-a landa k.

1920, 23—24 junio en St. Gilles 9-a landa (La 7-a kaj 8-a belgaj kongresoj okazis en Anglujo dum la milito organizitaj kaj ĉeestitaj de belgaj E-istoj, loĝantaj tie provizore.)

1921, 15—16 majo en Lieĝo 10-a landa k.

1922, en Sankt' Nikolao en-Flandrio 11-a landa k.

1923, 20—21 majo en Namur 12-a landa k.

1924, 7—9 junio en Bruĝo 13-a landa k.

1925, 30 majo—1 junio en Verviers 14-a landa k.

1926, 22—24 majo en La Panne 16-a landa k.

1926, en Spaa 12-a Int. Katolika E-Kongreso.

1927, 4—6 junio, en Mons 16-a landa k.

1928, 10 junio en Bruselo 17-a landa k.

1928, 3—11 aŭg. en Antverpeno 20-a UK.

1929, 18—20 majo en Gento 18-a landa k.

1930, 7—10 junio en Lieĝo dum la Universala Ekspozicio, kun tutsomera E-a fako, 19-a landa k.

1931, 23—26 majo 20-a landa k.

1932, 14—16 majo en Antverpeno 21-a landa k.

1933, 3—5 junio en Bruselo 22-a landa k.

Ĉiuj kongresoj ĝuis la oficialan apogon de la lokaj aŭtoritatoj kaj la UK-j staris sub la protektado de la belga reĝo. Prez. de la 1—3-aj landaj kongresoj estis A. V. d. Biest, prez. de la 4—6-aj, 11-a, 13-a landaj kongresoj kaj la Int. Semajno-kongreso en 1910 A. J. Witteryck, prez. de la 9, 10, 12, 14—16 kongresoj L. Cogen, prez. de la 17—22 kongresoj estis Fr. Schoofs.

La LKK. de la 7-a UK konsistis el s-roj Van der Biest-Andelhof, D-ro Van Der Biest, Dupont kaj Ritschie, f-ino Posenae, kiu estis sekretariokasisto. Tiu de la 20-a UK konsistis el s-ino Elworthy-Posenae, s-roj Schoofs, Oscar Van Schoor, M. Jau-motte, Adv. Roest, Vermandere, kaj

Ritschie. — En ambaŭ kongresoj profesiaj aktoroj ludis teatraĵon en Esperanto. En la unua »Kaattje« de Spaak (trad. Van Der Biest), en la dua Hamleto-n.

La artikolon verkis malnova belga E-isto, tralegis H. PETIAU.

La flandra movado. En julio 1929 aperis en Antverpeno Flandra E-isto per la zorgoj kaj klopodoj de Flandrema Grupo E-ista. La publikigo de ĉi tiu monata revuo decidigis pri la fondo de flandra ligo. Je Pentekosto 1930, en Antverpeno, la 1-a flandra kongreso de E firme starigis sian propran ligon kun advokato Jozef Muys kiel prez. kaj Edgard Verheyden kiel sekr. Flandra E-isto de tiam fariĝis ĝia oficiala organo, kun Jan Van Schor kiel ĉefred. Dum tiu kongreso oni ankaŭ skizis la statutojn de la nova ligo, kiuj ricevis definitivan formon la 21-an de sept. en Gent. Art. 2 mencias, ke FLE celas: propagandi E-n inter la flandroj, konigi ĉe la aliaj popoloj la kulturstaton flandran; akceli la mondpacon laŭ sia povo. Montrigis baldaŭ la neceso havi ankaŭ propran-librejon. Tiucele, 30 nov. 1930, f-ino J. Terryn el Gent kaj G. Debrouwere kaj Alb. Cogne el Kortrijk fondis societeton Flandra E-Instituto, leĝe registrita. La akcioj de FEI ne donas rentumon. La profitoj servas por la E-propagando. La 2-a flandra kongreso okazis en Aalst kaj aliĝis 175 partoprenantoj; por la 3-a en Kortrijk, je Pentekosto 1932, tiu nombro jam estis 201 kaj la urbestro subvencias la eldonon de plaĉa gvidlibreto. En 1932 parte renoviĝis la estraro de FLE, kies prez. nun estas Leo Calloens el Aalst kaj sekr. Gerard Debrouwere el Kortrijk. El la agado de FLE ni mencias precipe publikigon de E-kurso en »Toerisme«, organo de la Flandra Turista Asocio, havanta 145.000 membrojn. La programo de la Popoluniversitato »Herman Van den Reek« en Antverpeno mencias E-kurson. Inter la studentoj de la Genta ŝtatuniversitato okazis vigla propagando kaj kerno estas starigita. Reto da sekcioj kaj delegitoj kovras la flandran landparton de Belgujo.

G. DEBROUWERE.
Belhor: Blindaj E-istoj loĝantaj en Hungara Reĝlando, v. Blinduloj.

Belhoste (belost) Léon, (ps. L. B.), franco, oficisto en la urba administracio de Paris. Nask. 29. jan. 1890 en Rouen. Komitatano de SFPE. Gvidas kursojn depost 1910. Verkis kun Doue la Gvidlibron de la 24-a UK.

Belmont Leo, ps. de adv. Leopold Blumental, polo, ĵurnalisto, verkisto; loĝas en Varsovio. Nask. 8 marto 1865 en V. Fininte la universitaton fariĝis red. de semajna lit. kaj politika gazeto »Libera Vorto« (pola), kin li plenigis mem de komenco ĝis fino. Pro artikoloj B. estis malliberigita 5 fojojn, unu fojon ankaŭ ekzilita Verkis proks. 100 librojn, inter ili en la pola lingvo 3 grandajn volumojn da poeziaĵoj. Liaj historiaj romanoj (»Messalina«, »Mme Pompadour«, »Dubarry«, »Veĉera«, k. a.) estas tre legataj libroj. Lerta tradukisto, bona oratoro, majstro de la deklamarto. En la E-movado B. okupas same gravan lokon. Jam en 1887 li sendis salutleteron al Z, finante per la profetvortoj: »Vi venkos, sinjoro!« Jam tiam li komencis skribi grandajn artikolojn sur bazo de profunda lingvistika scio; »Libera Vorto« ofte estis preskaŭ plena je defendo de E. Liaj artikoloj pri E ĉu en la pola, ĉu en la rusa gazetaro estas multegaj. Estis gvidanto kaj vicprez. de l'unua rusa ES (en Petrograd) kaj poste de l'unua pola ES (en V.). Dum la 1-a UK li proponis pri ĉiujara kongreso de E. Nun estas vicprez. de PEA, LK kaj Akademiano. En E li ankaŭ verkis multe kaj kunlaboris al multaj E-gazetoj. Librorforme eliris en 1908 liaj Sonoj Esperantaj. Atenton meritas lia pola E-gramatiko en versoj mnemonikaj. Bona oratoro ankaŭ en E.

E. WIESENFELD.

Belogorcev Viktor, sovetiano, ruso, laboristo. Nask. 1903 en Tomsk (Siberio). Fariĝis E-isto en 1919. Aktive propagandis E-n kaj organizis rondetojn en Tomsk, Barnaul, Nikolajev. De post 1931 membro de CK SEU.

Beltrao (beltrau) Antonio Carlos de Arruda, brazilano, d-ro, distrikta ĉefinĝ. telegrafa. Mortis en 1928. Fond. kaj prez. de EK en Maceio (Alagoas, 1909), kie li faris grandan propag-

andon. Prez. de BKE kaj de la 3-a B. Kongreso de E.

Bernaldo Luzo, v. Almeida Martins.

Benárd Āgost, hungaro, d-ro, eksministro, ĉefkuracisto. Nask. 3 jan. 1880 en Budapest. Prez. de la Hungara E Ekzamena Komitato.

Benink Grietje Harmina, nederlandano, instr. Nask. 20 nov. 1892 en Wedde. Fond. kaj prez. de EG en Almelo de 1925, estrarano de LEEN de okt. 1932. Kursgvida kaj prop. laboro. Verkis lernolibrojn, 1928, 31.

Bennemann Karl Heinrich Paul, germano, popollerneja instruisto. Nask. 13 marto 1885 en Leipzig. E-isto de 1909; LK de 1927. Gvidis kursojn, precipe por instruistoj, ankaŭ por infanoj. Specialaj kampoj: kritika prilaborado de la E vorttrezoro kaj la muziko. Prelegoj muzikaj ĉe la UK en Edinburgh kaj en Oxford. Tre multaj artikoloj precipe kun populare scienca enhavo. Kunlaboranto de multaj E gazetoj. Presitaj verkoj: Gyges kaj lia ringo, dramo de Hebbel, 1916; La flavaj folioj (la germanaj oficialaj telegramoj de la militkampoj), 1914—16; Tra la mondo, legolibro I—II, 1921—22; Vortaroj E-G (ankaŭ por blinduloj), 1923 kaj G-E, 1926; Int. Kantaro, (130 popolaj kantoj el 55 landoj, 7 E k. a. kantoj, koncertarioj); tekstaro kaj muzika eldono, 1930; Psikologia Terminaro, 1932. Manuskripto de la trad. de Faŭsto (Goethe). Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Benŝafar Jakob A., egipta hebreo, prof. (kelkan tempon en Kaunas). Estis konata prop-isto en Eŭropo kaj Ameriko. ŝ.

Benson William S., usonano, kuracisto en Newark. Aŭtoro de originala bildmetodo por la instruado de E. Verkis 10 kajerojn de Universala E-istigilo, 1925—27; kaj la grandiozan Universala E-Metodo, 1933.

Beraru Miŝu, rumano, presisto. Nask. 30 dec. 1903 en Piatra-Neamt. Lernis E-n en 1925. Gvidis kursojn. Kompilis lernolibron (1926), portretalbumon de RES (1928), aperigis poemaron kun i. a. lokaj aktualajoj Spite la vivon (1928), kom-

pilis (kun P. Firu) la unuan E-R kaj R-E Vortaron (1932). Kunlaboris ĉe 'LM'. Ne plu verkas.

Berger Joseph Ferdinand, (ps. Jobe, B. K.), germano, redaktoro de Heroldo de E. Nask. 7 okt. 1894 en Edersdorf, Ĉeĥoslovakujo. E-isto de 1910. Fondis grupon en Waldshut, (Germ), gvidis kursojn tie, en Hispanujo kaj en Köln. Kunlaboris por pluraj E gazetoj. Trad.: La vojo returne, de Remarque, 1931; kunlaboris en la traduko de Enokcidento nenio nova, de Remarque, 1929. De 1934 gvidestro de Revelo.

Berger Leopold, ĉeĥo, ĥemia inĝeniero. Nask. 9 marto 1887 en Vrchoslav. E-isto de 1908. Funkciulo de diverslokaj kluboj. Fondinto de Bohema E-Servo kaj eldonanto de BES Adresaro (v.). Eld. de jarkolektoj de prop. gazetoj. Verkis Ĉ-E Vortareton.

Bergiers (berjie) Leon, belgo, organizanto. Nask. 30 jun. 1904 en Bruxelles. Prizorgis la interhelpan movadon, lit. kursojn, verkis francan teatraĵon, kunlaboris al ruslingvaj revuoj. E-isto de 1922. Havis gravan rolon en SAT, ĝis proks. 1930, de kiam li ne partoprenas movadan vivon. Verkis multajn rakontojn, priskribojn pri nuntempaj verkistoj por SR, La Nova Etapo. Libroforme aperis: tradukoj Servokapabla de Eekhoud, 1927; La Morto de Blanjo de Toussele, 1925; la originalaĵo Ili, 1921.

Berki Géza, hungaro, direktoro de juĝejoj helpkontoroj. Nask. 3 marto. 1892 en Szatmárnémeti (nun en Rumanujo). Dir. de ĝardeninstituto, ktp. Multajn jarojn unu el la gvidantoj (sekr. de HES) de tre vigla E movado en Debrecen.

Berman Oskar, komerc-ekonomia red. en Lodz (Polujo). E-isto ekde 1915. Laboras por E precipe sur turisma kampo; gvidas karavanojn. Prez. de ES en Lodz. Multaj prop. artikoloj pol-, german- kaj hebrea lingvaj.

Bern. Ĉefurbo de Svislando, 113.000 loĝantoj. — 9-a UK 24—31 aŭg. 1913, 1015 kongresanoj el 30 landoj; fidesprimo al la Lingva Komitato; akcento de kunagado.

Bernfeld Erwin Gerhard, aŭstriano, germano, ŝtata ofic. en Wien. Nask. 10 nov. 1891 en Wien. E-isto de 1924, sekr. en grupo »Ofichavantoj«-Wien, prez. ĉe »Aŭ. Pacifista Soc. E«-Wien. Depost 1926 ĉefdel. de UEA.

Berthelot (bertölo) Paul, franco. Nask. 1882, mortis 2 nov. 1910 en Conceição de Araguaya (Brazilo). Lernis E-n 1900, kiam li studis en la liceo de Reims. Fervora propagandisto, li fondis la gazeton Esperanto (18 jun 1905), kiun li transdonis en 1906 al Saussure kaj Hodler. Iniciatinto de Int. Socia Revuo. Li forvojaĝis al Brazilo, kie li daŭrigis sian propagandon. Grave kaptita de tuberkulozo, li pasigis siajn lastajn semajnojn instruante la monaĥojn, kiuj flegis lin, kaj preparante kun ili latinan lernolibron Compendium grammaticae E. Li enpresis en »E« la unuan provon de vortaro E-E (kun E-e redaktitaj difinoj de la radikoj). Verkis (kun Cart kaj Merckens): Vortaro franca-E-a, 1903 — (kun Lambert) Komercaj Leteroj, 1903 — Provo de ĥemia nomigado en E 1904 — Fonetika litera skizo pri keikaj konsonantoj (sub la ps. Marcelo Verema), 1904. LK. 1909.

L. BASTIEN.

Bertoli Alfons, kroato. Nask. en 1895 en Zadar (Zara), mortis 22 okt. 1926 en Zagreb. Frue aliĝis al E. Postmilita multe laboris en Zagreba ES, samtempe estante helpanto de la red. de La Provo kaj Konkordo. Estis sekr. de SEL. Kelkaj literaturaroj. ŝ.

BES: Bohema E-Servo, v.

BES-a Adresaro de E-istoj el ĉiuj landoj. Eld. de BES (L. Berger). Unua eld. 1919, 40 p., deka eld. 1932, 116 p. 1107 adresoj. »Gi povas esti grava praktika helpilo al la korespondema kaj interŝanĝanta E-istaro — kondiĉe, ke la personoj vere respondas.« (P. B., Bibliografia Gazeto, 1933, p. 24.)

Beveridge (beverig) John, skoto, pastro. Nask. 29 jun. 1857 en Ayrshire. E-istiĝis 1907. Unua prez. de Skota EF. Unu el la tradukintoj de la Nova Testamento. Artikoloj en multe da E gazetoj.

Bialystok (elp. bjaiŭstok, Z uzadis: Bielostoko). Urbo en la orienta parto de Polujo, kun 97.185 loĝantoj. Tie naskiĝis 15 dec. 1859 Z en dometo signita n-ro 6. ĉe strato Zielena (signifas: Verda), kiu nun estas nomata Strato Z-a. Sur la naskodomo de Z pendas marmora tabulo. En la domo troviĝas ora libro, en kiun enskribiĝas ĉiuj vizitantoj. La diverslingveco de la loĝantaro kaj la ofte neamikaj interrilatoj inter la diversaj gentoj donis al Z la impulson krei L. I. Dufoje okazis tre solenaj postkongresoj de la urbo (1927 kaj 1931). En la publika ĝardeno staras 12 metrojn alta monumento de Z laŭ projekto de la fama varsovia skulptisto A. Ostrzega, »Babela Turo«. La ĉefdel. de UEA por la pola teritorio, J. Ŝapiro, loĝas en B.

v. Stratoj. E. WIESENFELD

Bianchini J., italo, pastro en Friuli. Verkoj: *Hebrea kalendaro*, 1906; *du E-lernolibroj italaj*, 1913; *lernolibro de itala lingvo* 1913; *tiu de latina lingvo*, 1914—15; (aŭbaŭ por E-istoj); *prop. broŝuro*. Kunlaboris je *Espero* Katolika. L. K.

Biblio. Ne nur de la religia vidpunkto, sed ankaŭ pro ĝia elstara literatura valoro, la B. estas rigardata de granda parto de la homaro ĉefa literaturaro de la mondo. Z mem konstatis tiun gravecon, kaj jam en *La Revuo*, en ĝia unua volumo, kontribuis tradukaĵojn de *La Predikanto*. En la U. K. en Cambridge en 1907 komitato formiĝis por akceli la tradukadon de la B. Komitato elektita dum la brita kongreso en Leeds en 1909, entreprenis la tradukadon de la *Nova Testamento* el greka teksto. La ĉefan laboron plenumis pastro John Cyprian Rust kaj A. E. Wackrill kaj la traduko aperis en 1912 ĉe la Brita kaj Alianda Biblia Societo kaj Nacia Biblia Societo de Skotlando. La tasko pri la *Malnova Testamento* kuŝis en la plej kompetentaj manoj de Z mem, kiu kun admirinda persisto plenumis la laboron, tradukante el la hebrea originalo, kaj fine liveris la lastajn paĝojn nur kelkajn semajnojn antaŭ sia morto en 1917. Z konfidis la

finpretigon al brita komitato, kies ĉefa laboranto estis J. M. Warden. Dum la U. K. en Eĉinburĝ, 1-an de aŭg. 1926, en Diservo en la katedralo de S-ta Giles, la tuta E-a Biblio estis solene kaj publike dediĉita. La eldonon kaj la klišon de la kompostajo ebligis malavara financa subteno de f-inoj Peckover. (v. „E”, *Genève*, 1926, p: 137.) — Nombro de bibliopartoj venditaj en E ĝis 31 dec. 1931, estas: *Biblioj kompletaj*: 5444, *Novaj Testamentoj kompletaj*: 22,727, *Evangelioj kaj Psalmaro* (aparte eldonitaj): 14,231.

M. C. BUTLER.

Bibliografia Gazeto. Kvaronjara eldonaĵo de L. M. en 1933; formato 15×22 cm; tuta paĝonombro 72. Redaktis Kalocsay, multe kunlaboris Totŝche. Ampleksan lokon okupis la detalaj recenzoj, estis rubriko *Revuo de revuoj*, informoj pri AELA, ktp. Ekde 1934 B. G. estis anstataŭata per *Lingvo Libro* (v.)

Bibliografio de Internacia Lingvo. Historia sistema katalogo. Elaboris kaj komentaris P. E. Stojan. UEA, 1929, 560 p., formato 24×16 cm. »S. ne limiĝis sian serĉadon al E, nek al aliaj sistemoj de helpingvoj; li vastiĝis ĝin, ampleksante ĉion, kio iel militis, vane aŭ sukcese, kontraŭ la baro de P diverslingveco. Tial, li studis la provojn de universala alfabeto, de filozofia gramatiko, de logistiko, de pasigrafioj, aŭ la uzatajn gestlingvojn, ciferskribojn, int. stenografiojn kaj signarojn. Ĝi estas esence la listo de ĉiuj verkoj, kiuj traktis la ĵus cititajn temojn, kun monro de P aperdato, loko, presejo, paĝnombro kaj formato. Pri la gravaj verkoj, tiujn informojn akompanas mallonga resumo, aŭ citaĵoj, aŭ rimarkoj de P kompilinto. La verko, kaj ĝiaj diversaj ĉapitroj, estas prezentataj per atentindaj enkondukaj artikoloj. Ĉio atingebla estis uzata.« (G. S., „E”, 1930, p: 34.) Tiu ĉi gravega verko estis plej multe uzata dum la redaktado de la *Enciklopedio*, kaj malgraŭ ĝia nepraktika dividado, ĝi tre faciligis la redaktan laboron.

Biblioteko de BEA (Brita E-ista Asocio). En 1922 BEA starigis Konsultan Bibliotekon. Iu amiko donacis.

380 volumojn el sia privata kolekto kiel nukleon. De tiam la biblioteko daŭre kreskis per aldono de libroj donacitaj aŭ aĉetitaj, kaj de ĉiu nova E-a libro ĉe apero. La gvidanto de la biblioteko estas M. C. Butler, kiu klopodas, ke la biblioteko enhavu laŭ la eblecoj ĉion kun rilato al E aŭ al int.-lingva movado ĝenerale; ankau verkojn pri lingva instruado kaj pri la filologio de naciaj lingvoj; kaj ĉiajn konsulto-librojn. Krom la ĉefa kolekto de libroj (en tri sekcioj laŭ grandoj), troviĝas ankaŭ apartaj kolektoj de broŝuroj, manuskriptoj, fotografiaj, prestranĉaĵoj, muziko, poŝt- kaj bild-kartoj, kaj glumarkoj: ĉio pri E aŭ kun E-a teksto. Sur aparta bretaro troviĝas la lastaj n-roj de la E-a gazetar. La jarkolektojn oni bindigas laŭ eblo. Ĉio en la biblioteko estas klasita laŭ la decimala sistemo (Dewey Decimal Classification) kaj la plibonigoj de la Int. Bibliografia Instituto en Bruxelles. Laŭ tiu sistemo ĉiu temo ricevas difinitan numeron, kun aldonaj subdividoj por indiko de formo, loko, dato, lingvo, rilato, kaj aliaj vidpunktoj. Por la pri-E-a sekcio oni ellaboris apartan klasigon tre detalan. Ĉio en la biblioteko (libroj, broŝuroj, muziko, kaj eĉ gazetartikoloj) estas enskribita en unu komunan indokson. Tiu Klasita Katalogo listas ĉiun eron laŭ numera ordo, kaj montras ĉion, kion la biblioteko enhavas pri ĉiu temo. Troviĝas ankaŭ Alfabeta Indekso de titoloj, temoj, kaj nomoj, kiu ebligas ĉion trovi, eĉ sen kompreno pri la sistemo. La ĝeneralan laboron prizorgas la sekr. de BEA, M. C. Butler, la gazetan fakon atentante E. A. Hawkins, helpate lastatempe de F. B. Elwell. La enskriboj en la Katalogo klasigiĝis en 1931 jene:

0	Generalaĵo	150
1	Filozofio	350
2	Religio	500
3	Sociologio	900
4	Filologio	1050
5	Scienco	650
6	Teknologio	1200
7	Arto, Sporto	400

Transporto 5200

	Transporto	5200
8	Literaturo	1950
9	Historio, Geografio, Biografio	1850
E 0	Esperanta Movado	1500
E :	Esperanto Aplikata	600
E 1—E 9	Esperanta Lingvo	1600
G. L.	Gazetar (propaganda, literatura)	100
		12800
	Alfabeta Indekso	9800
	Slipara sumo	22600

Krom la libroj troviĝas ankaŭ 3720 kartoj kaj fotografiaj; 21 metroj da skatoloj plenaj de gazetoj, muziko, kaj bildoj; kaj 80 skatoloj da broŝuroj kaj manuskriptoj. Tial ke la biblioteko estas konsulta kaj ne prunta, oni ne permesas la forporton de libroj el la ĉambro; sed la tuta kolekto estas je la dispono de la studantoj. En ĝi troviĝas multe da libroj el la fruaj jaroj de E, kaj amaso da aferoj netakseble valoraj por la studentoj kaj ĝi rimarkinde kreskad.

Laŭ BRITISH E-IST, 1931, p. 120.

Biblioteko de C. O. (Centra Oficejo). Unu el la celoj de Centra Oficejo (fond. 1905) estis: klasigi kaj konservi arkivojn, organizi bibliotekon, kolekti ĉiujn sciigojn, starigi bibliografion. Jam en 1905 ĝi kolektis en sia leĝoĉambro (51, rue de Clichy, Paris): bibliotekon enhavantan la ĉefajn verkojn aperintajn de la komenco, kolekton da revuoj kaj gazetoj, bibliografiajn katalogojn ordigitajn laŭ la bibliografia decimala klasigo, specialajn katalogojn (adresaroj ktp.)

Generalo Sebert, prez. de C. O., daŭrigis tiun kolekton, kiu en 1929 translokigis en la grandan Bibliotekon de la Pariza Komercambro (27, avenue Friedland, Paris), dank'al la malavara konsento de Sebert kaj al la favora sinteno de André Baudet, tiama prez. de la Ĉambro. Nun ĝi ricevas ankoraŭ nur keltajn gazetojn.

Jen ĝia konsisto en 1929:

Fako A — Oficiala Gazeto: Oficiala Dokumentaro, kaj diversaj publikaĵoj de C. O. (55 volumoj).
Fako B — Jarlibroj (70 volumoj).

Fako C — Oficialaj raportoj pri la UK-j kaj Kongreslibroj (85 volumoj).

Fako D — Lernolibroj (335 vo'umoj).

Fako E — Vortaroj (140 vol.).

Fako F — Propagandaj broŝ. (600).

Fako G — Socialaj sciencoj, filozofio, juro, religioj, ktp. (300 vol.).

Fako H — Sciencoj puraj kaj aplikataj (220 vol.).

Fako I — Komerco, turismo, internaciaj foiroj (320 vol.).

Fako J — Literaturo (600 vol.).

Fako K — Gazetoj (240 vol.).

Entute 3000 volumoj aŭ broŝuroj, plus 40.000 eltranĉaĵoj de ne-E-aj gazetoj. L. BASTIEN.

Biblioteko de Davidov. En apudvolga gubernia urbo Saratov, Rusujo. Ĝi estas unu el la plej famaj E-bibliotekoj. Ĝia katalogo aperis dufoje: en 1908 ĉe Möller kaj Borel en Berlin kaj en 1911 ĉe Germana Akademia E-Ligo. Laŭ tiu ĉi dua eldono la biblioteko havis 1996 titolojn de libroj, broŝuroj kaj prop. folioj presitaj kaj hektografitaj (10.000 titolojn de ĉiaj eldonaĵoj en kaj pri E enkalkulante muzikaĵojn, ilustritajn poŝtkartojn, fotografaĵojn, prop. markojn ktp.) jene dividitajn (statistiko de ECO) laŭ decimala klasifiko:

Filologio-lingvoscienco	53.90%
Literaturo	18.98%
Historio-geografio	7.16%
Bibliografio	3.00%
Socialaj sciencoj	3.26%
Aplikataj sciencoj	5.26%
Belartoj	3.66%
Religio	1.86%
Ekzaktaj sciencoj	1.56%
Filozofio	1.36%

Post la rusa revolucio 1917 la sovetista registaro naciigis la bibliotekon, sed en 1921 pro malgrandigo de la regna buĝeto, »Saratova Polit-Prosvet« (liberiga regna institucio) rifuzis ĝian administran kaj finanĉan prizorgadon. Privatigita E-istoj (Sajapin, E. Ananjeva) faris heroajn klopodojn por konservi la bibliotekon, (l. S-ulo, 1925, n-ro 33.), kiam tiu magazena ejo, kie estis la biblioteko lokita, estis luigata al privatulo. En 1922 la bibliotekon prenis sub sian protekton Saratova E-Societo, en feb. 1923 la gubernia filio

de SEU, kies ĝen. sekr. Sajapin kun sia familio ekloĝis en ĝia malvasta trapolvita ejo. Ĉar la sama ejo servis ankaŭ kiel E-kiubo, kursejo kaj librodeponejo, Sajapin estis devigata por du jaroj sigeli la ŝrankojn, por ke ne pereu la librotrezoro. Fine en 1925 la Saratova Gub. Polit-Prosvet komencis akceptadi kaj inventarigi tiun ĉi multekostan popolan proprajon, sume 9500 ekzemplerojn ĉiuspecajn. SIRJAEV.

Biblioteko de la Lingvo Internacia.

Fondita en 1894 laŭ propono de Z (E-isto, 1894, n-ro 3.), estis la unua kolekto de E lit. verkoj; ĝi estis presata en Nürnberg ĉe W. Tümmel kaj ĝia eldono daŭris ĝis 1898. »La biblioteko, red. kun plej granda zorgemo de nia kara Majstro mem, aperadis laŭ formato 14x21. Ĝi enhavis pleje verkojn de rusaj aŭtoroj, aŭ tradukitaj, aŭ originalaj, kaj ankaŭ lernilojn en diversaj lingvoj. Netakseble valoraj estas por ĉiuj veraj E-istoj tiuj ĉi kajoroj kun verdaj kovriloj.« (El artikolo de K. Steier, represita en Möbusz: Dokumentoj, p: 33.)

Biblioteko de UEA, en Ĝenevo (Genève). Hodiaŭ la plej ampleksa biblioteko pri E kaj la tutmonda lingvo estas tiu de UEA. Ĝi apartenas al la Asocio kaj estas parte speco de dokumentiga fonto por la oficejo de UEA, la redakcio de 'E' kaj pli vaste por la E-istoj, kiuj deziras informiĝi serioze pri ia detalo de la libraro de E.

Iam, antaŭ la fondo de UEA la Svisa E-Societo starigis bibliotekon. Ĝin administris tre zorge du personoj: s-ro Schmid, filo de konata svisa E-isto Jakob Schmid, en Bern, kaj Eduard Stettler, la prez. de UEA. La biblioteko konsistis el kelkcent numeroj, plej parte binditaj libroj. Ed. Stettler veninta al Ĝenevo por libervole labori en la oficejo de UEA prizorgis la bibliotekon. La Svisa Societo tamen ne tre interesiĝis pri tiu ĉi biblioteko kaj estis nefacile trovi iun, kiu daŭrigus la prizorgon. Por forigi balaston la SES cedis la bibliotekon al Hector Hodler, kontraŭ pago de modesta sumo.

La tiama Centra Oficejo kun siaj sep oficistoj tamen ne havis la tempon nek intereson pri la daŭrigo de la afero. Venis en 1913 nova oficisto,

Hans Jakob, kiu okupiĝis en sia libera tempo kaj daŭrigis kompletigi la tiam ankoraŭ tre modestan kolekton. Ĝi apartenis fakte ja al la posedanto de la gazeto 'E', kiu transdonis la librojn ricevatajn por recenzo donace. Modesta kredito permesis akiri interesajn verkojn kaj de tempo al tempo iuj samideanoj donacis sian bibliotekon al ĝi. H. Hodler testamente donacis la bibliotekon al UEA (1920).

La statuto de UEA mencias la administradon sub Art. kiu diras »50. La Biblioteko de UEA kolektas ĉiujn konservindajn E-lingvajn presajojn, kaj interesajn verkojn en kaj pri lingvoj int. Ĝi akiras ilin laŭeble el redakciaj ekzempleroj, donacoj kaj interŝanĝoj. Por la biblioteko kaj por materialo de E-ekspozicioj estu rezervata modesta kredito en la budĝeto. Tiom kiom la Centra Oficejo povas okupiĝi pri bibliotekaj aferoj, la aktivaj membroj rajtas pruntepreni materialon kaj librojn laŭ fiksitaj kondiĉoj.«

La sistemo laŭ kiu estas ordigata la biblioteko, estas tre simpla plene respondanta al praktika bezono. Starigis ĝin Ed. Stettler kaj el kelkajara sperto kompletigis la bibliotekisto de UEA.

La tuta materialo estas klasigata en 8 klasoj.

1. Helplingvo: (H) entenas propagandilojn, lernolibrojn kaj vortarojn naciajn-internaciajn, entute la lernadon.

2. Literaturo kaj Arto: (L) entenas la tutan beletristikon, tradukan kaj originalan. Subdivido: Poezio kaj muziko.

3. Scienco kaj Tekniko: (S) entenas sciencajn verkojn en tre larĝa kompreno, plie teknikajojn.

4. Periodaĵoj: (P) entenas la E-gazetaron. Fako por periodaĵoj ne-E-aj sed kun E angulo aŭ aldono.

5. Oficialaĵoj: (O) entenas statutojn, dokumentarojn, raportojn de naciaj kaj int. organizaĵoj E-aj, tiom kiom ili estas publikaj kaj riceveblaj.

6. Uzado de E: (U) estas nova klaso, kiu entenas dokumentojn pri la praktika uzado de la lingvo (komerco, turismo, ktp.)

7. Aliaj mondlingvoj: (X) estas la klaso kiu reunuigas ĉion pri tutmondaj lingvoj. Dokumentoj pri 150 sis-

temoj de L. I. iafoje fragmentoj, sed plejofte ankaŭ gramatiko.

S. Diversaĵoj: (D) kio ne trovas lokon en la aliaj klasoj, estas klasigata sub D.

Al la ok klasoj respondas ok koloroj: H (verda), L (blua), S (vinruĝa), P (ruĝa), O (flava), U (rozkolora), X (blanka), D (ora). La etikedoj kun numeroj estas en tiuj koloroj, kio evitas malĝustan lokigon, precipe de la binditaj libroj.

La konservon de la libroj oni organizis tiel, ke ĉio, kio ne estas bindita (kaj ne bindigebla parte pro la altaj kostoj) estu en kartonaj kestoj, laŭ sistemo de la Nacia Biblioteko Svisa. La kestoj ekzistas en tri modeloj, malgranda, normala kaj grandega.

La ordigo de la slipoj okazas laŭ plej simpla maniero, pro evito de laborforto ĉiam mankanta por tio. Principe ĉio iras laŭ la aŭtoro, ne laŭ la tradukinto. Do verkon de Molière oni serĉu sub tiu nomo kaj ne sub tradukinto. Aparte de la serĉ-sliparo ekzistas alia, tiu de la E-aj verkistoj, kio estas speco de repertuaro kaj kie estas notita ĉio pri-E-aj aŭtoroj.

Je la fino de 1932 la biblioteko enregistris 7900 numerojn. Deprenante proksimume 1500 por E-gazetoj, ĉ. 500 klaso X kaj 500 por oficialaĵoj, restas por la efektiva literatura (instrua, beletristika kaj scienca) proks. 5400 verkoj. Tio estas konservata en grandegaj belaj murŝrankoj, en 700 kartonaj kestoj fermitaj. La biblioteka ĉambro troviĝas en la Turo de P' Insulo, kvarangula ĉambrego, kvazaŭ farita por tiu ĉi celo.

La Biblioteko de UEA estas la kaŭzo de la kreo de Bibliografia Servo de UEA, kies tasko estas la sistema kolektado de ĉiuj verkoj en E kaj helpo al la personoj sin interesantaj pri nia literaturo. La jara raporto de UEA mencias tiujn agadon. La Bibliografia Servo ankaŭ akiras, interŝanĝas kaj donace akceptas verkojn pri ĉio, kio tuŝas E-n kaj ĝenerale la demandon pri L. I. E. AGRICOLA.

Biblioteko Tutmonda. Kolekto de literaturaj kaj sciencaj verkoj. Formato 17×10 cm. Eldonis la grava firmo Mosse, Berlin; trompiĝinte je la aĉetpovo de la E-istoj, Mosse

transdonis la tutan librokvanton al la firmo Ellersiek, Berlin. Entute aperis 25 n-roj.

Bicknell (biknel) Clarence, anglo, d-ro de matematiko. Nask. 27 okt. 1842 en Herne Hill (Anglujo), mortis 17 jul. 1918 en Tenda, Cuneo (Italujo). Estis anglikana pastro, poste forlasis la eklezion. Venis Italujon en 1877. Konstruigis muzeon en Bordighera por enteni siajn kolektaĵojn botanikajn kaj arkeologiajn. Multe klopodis por blinduloj. Eksvolapükisto. E-isto de 1897, ĉestis la unuan UK. Transskribis E-ajn verkojn brajlen. En 1910 fondis grupon en Bordighera, kiun li prezidis ĝis sia morto. Mone subtenis multajn E entreprenojn. Verkis multajn originalajn poemojn, kiuj aperis en *La Revuo*, *The British E-ist*, (multaj restis manuskriptoj). Tradukis: *Horacio de Lord Macauley*, 1906; *Gvinevero de Tennyson*, 1907; *Rikoltado de la pecoj de Sturgis*; *Ŝakludo de Giacosa*, 1915.

Biehler (biler) Wolfgang, aŭstro-germano, d-ro fil., lingvo-instr. privata en Graz. Nask. 5 majo 1892 en Časlav (nun en ĈSR). E-isto de 1921. Sekr. de ES Stirio de 1931. Depost 1926 kunlaboranto de Aŭ. E-isto, rec. kaj trad. multajn verkojn: premiita ĉe Int. Floraj Ludoj.

BIL: Bibliografio de Int. Lingvo, v.

Biest-Andelhof Amatus van der, belgo, d-ro. Nask. 1850, mortis 1912. Pioniro, estis vicprez. de Antverpena EG, prez. de BLE, dir. de BELGA E-isto kaj prez. de »La Sepo por la Sepa« (1911). L. K.

Bildotabuloj por la instruado de Esperanto. Verkitaĵe de Thora Goldschmidt, prilaboritaj al E de Dietterle 1923, 104 p., formato 19×25 cm., 36 bildoj kun klariga teksto, ekzercoj, ekzemploj ktp. Uzebla de ĉiuj naciojn.

Bischitzky (biŝicki) Adolf, germano, d-ro, kuracisto en Praha. Nask. 18 nov. 1871 en Driz. Humanisto, liberpensulo, prez. de Ĉ. Ligo de Homaj Rajtoj. Kunfondinto (1908) kaj de 1911 prez. de Societo de germanlingvaj E-istoj en Praha. De 1921 ano de ŝtata ekzamena komisiono. Gvidis kursojn, estis prof. de E en la

germanlingva Komerca Akademio en P. Kunlaboranto de Int. Med. Revuo, Marto, ktp. Tradukis *Maria Magdalena de Hebbel*; *Suferoj de la juna Werther de Goethe*; *La aliformigita dridado de H. Salus*. Verkis ekzercaron por germanoj, 1922.

Blaas (blas) Leo, aŭstro-germano, d-ro, emerita helpjuĝisto en Netters ĉe Innsbruck. Nask. 14 jan. 1891 en I. E-isto de 1908. Iama prez. de EK de I. Tradukajtoj en Aŭ. E-isto. Verkis *E la ŭ Mertner*. Kunlaboranto de d-ro Wüster (Enc. Vortaro). Verkadas ampleksan etimologion (morfologion) de E.

Blackett (blaket) Edmund R., anglo ekspresejstro. Nask. 20 dec. 1843 en Berkshire. E-isto de 1905. Dumviva membro de UEA kaj delegito por Bath. Prez. de la loka grupo.

Blackham (blakam) C. P., irlandano, mortis en 1931. Unu el la plej fruaj E-istoj en Irlando, de 1904. Ĉestis la 1-an UK.

Blaikie (blejki) James Andrew, anglo, konata matematikisto, universitata ekzamenisto, montogrimpisto. Nask. 4 apr. 1846, mortis 21 dec. 1929. E-istiĝis en 1905. Kunlabore tradukis *La Malbela Anasido* tiujare kaj *Bela Joe* en sia lasta jaro.

Blaise (blejz), Margaret Lily, nask. Jones, anglino, edzino de B. P. Nask. 30 apr. 1878 en Chester. Sekretario de 1896, komerca lernejestro 1900—06. 1906—10 (edziniĝo) instruis E-n en vesperaj lernejoj de kelkaj urboj. Fondis kaj prezidis: E Fed. de Lancashire kaj Chesire (tri jarojn), Sud-Londona EG, Dua-Dimanĉa Rondo, London. Propagande paroladis multloke. Predikis E-e en la Katedralo de Genève, 1925. Instruas E-n en Londonaj lernejoj. Verkis *The Esperanto Manual*, 1908; *La Profitoj de E*, 1909; *A World Language*, 1916. Laboras ankaŭ literature. L. K. de 1908.

Blaise (blejz) Paul, (ps. P. B.; PoBo), belgo, sekr. de BELGA Komerca Cambio en London. Nask. 22 dec. 1880 en Louvain (Belgujo). Prof. de lingvoj kaj komerca korespondanto en Belgujo, Francujo kaj Anglu-

jo. En la tri landoj propagandis, instruis E-n kaj fondis diversajn grupojn. Instruis ĉe »Academie des Beaux Arts«, Louvain (1903), »Ass. Polytechnique« k. a., Paris (1904-7), London (1908-32). Helpsekr. de UK: Cambridge, 1907; Paris, 1914; kasisto de UK en Oxford, 1930. Direktoro de Int. Propagandejo E-ista; sekr. de Cekbanko E-ista (1937-10). Kunfondinto de UEA, ĝia delegito kaj komitatano de 1908; ĝia komisionano. Komitatano de BEA de 1913, ĝia kasisto (1929-31). Multaj artikoloj diversspecaj por E gazetoj.

Blake (blejk) Mary L., angliano, artisto. Nask. 4 okt. 1872 en York. Desegnas por sciencaj verkoj, gazetoj, brodado ktp. Medalo, London, 1897. Unua E-ista flugpasagero en Anglujo, 1911. Sekr. de politikaj kaj aliaj societoj por virinoj. E-isto de 1906. Membro de la Administra Komitato de BEA. Starigis kaj gvidis kursojn en Essex, Birmingham, London.

Blangarin Fernand (ps.: Fi-Blango), franco, suboficiro en armeo. Mortis 1914 en batalo ĉe la Marne. Fondinto kaj gvidanto de la laborista asocio »Paco Libereco«, poste »Liberiga Stelo«. Red. de Int. Socia Revuo 1907-09 kaj kunlaboranto al Le Travailleur E-iste. Trad. broŝurojn eld. de nomita asocio. Partoprenis ruĝulajn kongresojn en Genève kaj Cambridge.

Blanka Fratara, v. Novspirito.

Blankbarbulo. Ps. de prof. Th. Cart ĉe konstanta rubriko de la franca E-gazeto La Mova do.

Blassberg Maksimiliano, polo, kucacisto en Kraków. Nask. 28 apr. 1875. Aŭtoro de pli ol 60 medicinaj verkoj en lingvoj pola, germana kaj E-a. E-isto de 1912. Kelkajn jarojn estrarano de EG. Ĉefa E agado sur profesia kampo. Estis prez. de TEKA, nun ĝia honora ano. Artikoloj en la antaŭmilita Kuracisto, Int. Med. Revuo, »E«, LM.

Blaufeldt Rudolf, estono, drogisto. Mortis 4 apr. 1932 en Tartu. Dum 20 jaroj fidela prop-isto, kursgvidanto, UEA-del. ktp.

Bleier (Blejer), Vilmos, hungaro, nask. 14 majo 1903 en Ujpest. Studento en teknika ĉeflernejo, poste foira

komercisto, seruristo, 1924-30 administranto de HESL; de 1930 administranto, teknika aranĝanto kaj ĉefa posedanto de LM kaj AELA. E-isto de 1922, de tiam ĝis 1930 aktivulo en la laborista movado. Multaj kursoj, senomaj artikoloj. En 1932-33 paroladvojaĝoj en kvar landoj. (v. paroladvojaĝoj). Talenta oratoro E-ista; organizanto de la lit. vesperoj en la UK de Kraków kaj Paris. Redaktoro de la Enciklopedio.

Blinduloj. Prof. Cart ekde 1904 dediĉas parton de sia koro kaj laboro krei kunlaboron de blinduloj en la tuta mondo pere de E. Li komencas la unuan E kurson en la blindulejo de Lausanne (Svisujo) kaj konsentinte kun la plej sukcesintaj lernintinoj, Helena Galkaj Roza Vogt kaj kun Harald Thilander en Stockholm ili fiksis la brajloalfabeton por E donante por la kvin konsonantoj supersignitaj tute logikan brajloformon, almetante al la signoj de la pura litero ĉiam la saman punkton.

Tiam Cart brajle presigis gramatikojn de E en diversaj lingvoj, presigis la Fundamentan Ekzercaron, kaj kun argumentplena petskribo li disendis tiujn al ĉiuj reĝinoj de Eŭropo por ricevi apogon kaj financon helpon por tiu ĉi filantropia agado. La rumana reĝino, la poeto Carmen Sylva, patrino de sia landaj blinduloj fondinto de la iam mondfama »Vatra Luminoasa«, kaj la sveda reĝino Margaret estis la solaj, kiuj respondis kaj finance kaj agade helpis la movadon.

En 1904 Cart aperigis en brajla preso la unuan jarkolekton de la gazeto E-a Ligilo. Dekfoje en la jaro ĝi aperis. Blindulaferaj kaj pri-E-aj artikoloj, noveloj, poeziaĵoj, politika kroniko, humoro, diversaj problemoj alternis en la gazeto. La blindula legantaro akceptis favore »sian ĵurnalon« kaj la nombro de la abonantoj tre rapide ekkreskis. Komenciĝis baldaŭ kursoj en multaj blindulejoj diverslandaj, fondiĝis naciaj E-grupoj kaj en 1909 la UK en Cambridge jam gastigis dudek kvinon da geblinduloj, kiuj ĝoje kaj ĝue partoprenis unuan fojon en tiom

granda nombro la kongreson de vidantaj E-istoj.

Dum la libertempaj monatoj — aŭg. kaj sept. — de 1912 kun permeso de Cart eldonis du n-rojn la surda kaj blinda sveda brajlopresisto, Thilander. Liaj numeroj svarmis de interesaj, ĉefe blindulaferaj artikoloj. La legantoj aprobis la novan enhavon entuziasme, tiel, ke Cart tuj petis Thilander transpreni la redaktadon kaj eldonadon de E. L., kies fidela amiko kaj kunlaboranto Cart tamen restis ĝis sia morto. La legantaro kreskis, la Ĝenerala Adresaro aperinta en 1913 enhavis jam adresojn de pluraj centoj da blindaj E-istoj, la nomo »Ligilo« ekhavis specialan signifon: »Gazeto de Blinduloj.«

Post trijara paŭzo (1916—18) en 1919 jam ree aperas tri n-roj de E. L. Grava monhelpo de la Nacia Blindulinstituto de London ebligis regulan ĉiumonatan aperon de la gazeto dum multaj jaroj kun la kondiĉo, ke blinduloj de malbonvalutaj landoj ricevu la gazeton preskaŭ senpage. Oni sukcesis gajni multajn naciajn blindulunuigojn, kiuj finance regule helpis E. L. per fiksitaj jaraj kotizoj, tiel la angla Nacia Instituto povis ĉesigi la grandiozan kotizon de 200 pundoj por jaro sen risko, ke ĝia retiriĝo pereigus la gazeton. La interesan enhavon de la blindulaferaj artikoloj interŝanĝis abunde literaturaj, sciencaj, instruaj, kaj ĝenerala interesaj rubrikoj. Estis aldonitaj desegnaĵoj, landkartoj, ktp. La Ĝenerala Adresaro en 1931 jam superis milion da adresoj de blindaj E-istoj.

La unua kongreso de blindaj E-istoj okazis en 1921 en Praha. La preparajn laborojn gvidis la blinda muzikprof. K. E. Macan kaj la vidanta blindulamiko prof. Stanislav Stejskal. La kongreso havis neatenditan grandan sukceson. Prof. Cart mem direktis la kongreson, kies raporto, enketoj pri blindulaferoj en plej diversaj landoj, aperis en dika brajle presita volumo. Poste en ĉiuj jaroj, escepte 1925, samtempe kun la UK okazis la kongresoj de blindaj E-istoj.

Dum la dua kongreso en Helsinki deklaris Stejskal, ke li mem, kun

helpo de sialanda »Societo de Ĉeĥoslovakaj Nevidantaj E-istoj« (SOČNE) fondos la oficejon: Int. Blindulafera Informejo kaj Statistikejo (IBIS). La informejo kolektis kaj disponigis multajn valorajn sciigojn por int. kaj naciaj blindulaferaj celoj. Depost la morto de Stejskal ĝin gvidas Vuk Echter en Praha.

Inter la kongresoj plej grava estis la kvara en Wien, kiu definitive fondis la tutmondan asocion traktatan dum ĉiuj antaŭaj kongresoj: Universala Asocio de Blindaj E-istoj. UABE ekfunkciis tiam kun jena estraro: Prez. Josef Kreitz, Germ., dua prez. Paul Rémy, Franc., unua sekr. Victor Hendricx, vidanto, Belg., dua sekr. Anni Friman, Finn., kasisto W. P. Merrick, Angl., red. Harald Thilander, Sved., konsilanto prof. Stejskal. Unua ago de UABE estis eldono de nigrepresita priblinda gazeto Ligilo por Vidantoj, kiu per apartaj monsubtenoj aperas de tempo al tempo kun ĉiam interesaj enhavo kaj ilustraĵoj.

Unu post la alia fondiĝis blindulaj E-istaj grupoj en Ĉeĥoslovakujo, Finnlando, Hungarlando, Germanujo, Francujo, Danujo k. a. La ĉeĥoslovaka SOČNE regule aperigas gazeton A ŝroro, la E-ista Blinduligo de Germanio, la EBLOGO eldonas la gazeton La blinda E-isto, la hungara BELHORO (Blindaj E-istoj Loĝantaj en Hungara Reĝlando) ankaŭ eldonas iafoje siajn Sciigojn. Ĉiuj tri gazetoj estas brajlepresitaj.

UABE eldonis ankaŭ specialajn insignon kaj glumarkon. La internacia valoro de E montriĝas por blinduloj ĉefe ĉe la brajla presado, kiu okazas per reliefaj punktoj, kies alfabeton ni montras sur la klišo de E-a Ligilo. La presado okazas per duoblaj metalklišoj, stereotipataj per speciala maŝino. Inter la reliefigitajn metalplatojn oni metas la paperon kaj presas unuope la ekzemplerojn. Nia bildo montras la presejon de s-ro Ramadanoviĉ en Zemun, kie oni presas multajn esperantajn brajlajn librojn. En la presejo de Thilander, Svedujo oni preĝis interesan kajeron de »Naciaj Literaroj«, kiuj

montras reliefe la literojn de diversaj nacioj, kolektatajn per E kaj eldonatajn kun E-klarigof.

Per brajla presoj oni povas prezenti ankaŭ kolorojn kaj bildojn. Diversspecaj strekoj, diversgrandaj kaj densaj punktoj prezentas diversajn kolorojn, muskolojn ktp. Tiuj bildoj instruas por blinduloj multon el tio, kion nevindanto apenaŭ povas kompreni.

Du grandaj porblindulaj bibliotekoj, la angla nacia libraro en London kaj la germana centra libraro en Leipzig havas grandan provizon de E lingvaj verkoj brajleskribitaj, kiujn ili senpage pruntas al ĉiuj blinduloj en la mondo. La leganto bezonas nur pagi la poŝtpagon por la resendo al la biblioteko, nome 5 sv. centimojn por kilogramo (maksimume 5 kg., 25 centimoj). Kelkaj malpli grandaj bibliotekoj ankaŭ funkcias.

Diversaj brajlopresejoj eldonis valorajn beletristikajn, sciencajn kaj instruajn verkojn en E. Bonaj vortaroj ebligas al E-istaj blinduloj lerni fremdajn lingvojn. UABE ankaŭ ebligis al blinduloj partopreni literaturajn konkursojn tiamaniere, ke iliajn brajleskribitajn verkojn oni transkribis senkoste en nigran skribon. En kelkaj Int. Floraj Ludoj blinduloj havis gravajn sukcesojn. En multaj blindulaj lernejoj oni instruas E-n, en kelkaj devige.

Depost novjaro 1932 UABE ŝanĝiĝis je UABO: Universala Asocio de Blindul-Organizajoj, kies nuna estraro estas: unua prez. Kreitz, dua prez. Jan. Silhan, Poll., unua sekr. Thilander, dua sekr. d-ro Tancredi, It., Kas. W. P. Merrick kaj du konsilantoj, direktoro Veljko. L. Ramadanoviĉ, vidanto, Jugosl., kaj d-ro Miklós Bánó, Hung. La asocio havas delegitojn en preskaŭ ĉiuj landoj.

Rimarko. La artikolon trafegis Vuk Ehtner. MIKLÓS BÁNÓ

Blok Heiman, nederlandano, ĉefo de banko. Nask. 22 junio 1883 en Gorinchem. LK de 1910, kunfondinto de la unua EG en Amsterdam 1905 kaj ties prez., sekr. kaj kursgvidanto. Sekr. de NES, 1907, kaj red. de Amsterdama Pioniro en 1907. Prez. la unuan E-ekzamenon en N.

en 1910. Gvidis kursojn kaj donis publikajn lecionojn en multaj lokoj. Verkis prop. broŝuron, 1906; prilaboris kaj eldonis la N-E ŝlosilon kaj aldonan vortareton N-E. 1908.

Blokker Hermanus Jacob, nederlandano, vendorganizanto, Nask. 22 dec. 1900 en Zutphen. E-isto de 1915. Gvidis kursojn, estis prez. de la NSE, 1926—31, kunred. de Holanda E-isto, 1925—31 kaj membro de la ekzamena komitato.

Bloomfield (blumfild) Ester, brazilano. Sekr. de BLE. Multaj kursoj en Rio de J. kaj Belo Horizonte (ĉi tie ankaŭ E-kurso per radio).

Blumental Leopold, v. Belmont.

Boatman (bóutmn) Douglas Phillips, anglo, okula optikisto. Nask. 12 junio 1892 en Grays. 1915—1919 servis kiel soldato en Galipolo, Egiptujo, Palestino, Francujo, Belgujo. Unua prez. de ES de Southend-on-Sea, 1926. Unua sekr. de Rotaria E Amikaro, 1928. Unua prez. de Interligo Tutmonda de Optikistoj kaj Okulistoj, 1931. Verkis: La Nekonata Konato, originala rakonto, 1932. Multaj artikoloj, rakontoj, versajoj publikigis en The Rotary Wheeler (London), Int. Language kaj HDE.

Bobin (boben) Marcel, franco, inĝeniero, vitrajkomercisto. Nask. 19 aŭg. 1875 en Paris. Interesiĝas pri agado pacifisma, agado profilaksia, veneraj malsanoj kaj seksa edukado. Zorgas precipe pri instruado de E, kaj gvidas en Paris superan kurson. Verkis: Les Mots E groupés selon le sens, 1905. L. K. 1909.

Bodini Geometro Franco, italo, direktoro de la »Kaso por Malsanuloj.« Nask. 9 sept. 1904. E-isto de 1922. Direktoro de la nacia E organo en 1929—31. Organizis la naciajn kongresojn en Udine, 1929, Como, 1930, Padova, 1931. Estrarano de IEF.

Bodó Károly, hungaro, oficisto. Nask. 1903 en Monor. E-isto de 1921. Resp. red. de LM dum ĝia dua periodo; noveltradukoj ankaŭ en Hungara Heroldo. Varbis por Ekelkajn hungarajn verkistojn. Siajn unuajn tradukojn li kontribuis al LM (unua periodo), kaj en 1926 aperis lia traduke novelaro de F. Ka-

rinthy, Norda Vent o. Tiuj tradukoj jam pruvis neordinaran talenton, kiu brilis en lia traduko de la profunda Babits-romano, La cikoni-kalifo, (1929) kaj trovis entuziasman laŭdon ĉe recenzistoj kaj la Akademio. En 1933 li amplekse kunlaboris al Hungara Antologio per noveltradukoj, kiuj neniel perfidas liajn antaŭajn sukcesojn. Kio karakterizas liajn laborojn, tio estas unue, trafgusta elekto de tradukindaj verkoj, kaj due, naturstila rekreo de la originalo, tiel ke ĝi ŝajnas nova originalo E-a. Ligite per literaturaj laboroj, la Budapeŝtaj E verkistoj ricevis ian similecon de stilo, kiu ne estas facile difinebla, kaj kies rekonoblo ne dependas simple de konata neologismo; ĉar tio ja ne estas trajto de la Bodó-verkoj. W. B. JOHNSON.

Bofill M. Granada Narcis, kataluno, ing. (eksploatanto de karbminejoj). Nask. 24 apr. 1882 en Palma de Mallorca. E-isto de 1903, fondo de lokaj EG-j, kursgvidado, ĉeforganizinto de KEF-kongr. en Palma. Kunlaborinto de int. Ĝ-gazetaro. Du trad. libroj: La unika vesto kaj Mi estas anĝelo, 1925. L. K.

Bogdanov Miloslav, (E-igite: Di-odono, Favorgloro), bulgaro, notario, advokato. Nask. en urbeto Trn, loĝis en Sofia, kie li mortis ĉ. 1914. Aŭtoro de la unua lernolibro por bulgaroj, 1889, fondinto de la unua ES en B kaj eldoninto de la gazeto Mondlingvisto kaj de La Espero (baldaŭ ĉesintaj, 1889/91). Ĉ. 1908 li proklamis novan projekton de LI, imitajon de E kun multa enmikso de bulgaraj vortoj, kun strange kombinita alfabeto.

Bogh - Hogsted Agnes, danino. Nask. 15 jul. 1884 en Aarhus. Edziniĝis al oratoro, pastro P. P. Hogsted ĉe »La libera eklezio«, en kiu societo ŝi faris liberan, religian laboron dum 30 jaroj. Kun sia edzo fondis en 1909 E konversacian klubon de Aarhus. En dana lingvo aperis kelkaj beletristaj verkoj de ŝi.

Bohema Esperanto-Servo, entrepreno de ing. L. Berger, fondita de li en 1918. (v. Ĉeĥoslovakujo.)

Bohemujo, v. Ĉeĥoslovakujo.

Boirac (búarak) Emile, franco, d-ro fil., fama filozofo kaj rektoro de Akademio. Nask. 26 aŭg. 1851 en Guelma (Alĝerio), mortis 20 sept. 1917 en Dijon. Estis nomita rektoro de la Universitato de Grenoble (1898) kaj de Dijon (1902). Kiel filozofo, lia ĉefa verko estas lia tezo de doktoreco »La Ideo de la Fenomeno«; li penis akordigi la teoriojn de du el la grandaj francaj filozofoj, Renouvier kaj Fouillée pri la substanco, la reaĵeco de la ekstera mondo, la idealismo-fenomenismo. Li kreis la Instituton elektroteknikan de Grenoble, kaj la »pri-vinan« Instituton de Dijon. En 1900 li estis varbita al E per leteroj de Méray. Post iom da hezito li senlace laboris por E. Li prezidis la unuan UK en Boulogne-sur-Mer (1905). Poste li ĉeestis ĉiujn kongresojn, krom du. Elektita de D-ro Z kiel prez. de la Lingva Komitato, li subtenis energie la fundamentajn principojn dum la Idistaj atakadoj. Lia raporto al la Kvara Kongreso pritraktas lian partoprenon al la laboroj de la Delegacio kaj la konduton de tiu ĉi. En la lingvaj laboroj li partoprenis per gravaj verkoj, kaj lia granda Vortaro E-E-a estis unu el la plej gravaj libroj por la lingvolaborantoj. B. sin montris unu el niaj plej bonaj stilistoj kaj spertuloj. Per sia fluanta voĉo kaj ridetanta bonhumoro, kaj eble per sia psika influo, kune kun sia persona aŭtoritato, li ĝuis grandan influon en la E-istaj kunvenoj, kaj estis ĉiam tre atente aŭskultata. Li fondis diversajn grupojn kaj altiris al E gravajn Universitatanojn. Krom siaj multaj artikoloj en revuoj francaj (speciale en la Revuo Pedagogia) kaj E-aj (kiel la Revuo), li verkis: Trad. de Leibniz Monadologio, 1902 — ŝlosileto kvarlingva 1903 — Perdita kaj retrovita 1905 — Qu'est-ce que l'E? 1906 — Le Congrès E-iste de Genève, 1906 — Pri la homa radiado, 1906 — Trad. de Molière: Don Juan aŭ la ŝtona festeno, 1909 — Trad. de Van Dyke: La kvara Mago aŭ la alia Saĝulo, 1909 — Plena Vortaro E-E-a 1909 — Le problème

de la langue int., 1911 — Vortaro de la Oficialaj Radikoj 1911 — Fundamentaj principoj de la vortaro E 1911.

L. BASTIEN.

Boks kaj Koks. Komedieto de J. M. Morton, el la angla trad. Ch. Stewart. 1907, 27 p. Teatraĵo de la UK en Cambridge, 1907.

Bolivio, Suda Ameriko. Unuaj pioniroj: Victor Munoz y Reyer kaj Daniel Canedo, kiuj presis artikolojn en la ĵurnaloj de La Paz »La Verdad«, »La Integridad« kaj »El Comercio« kaj en 1905 fondis societon. Laŭ la Dietterle-statistiko en 1928 E-istoj troviĝis en tri lokoj. En 1933 UEA ne havis delegiton en B. I. ŠIRJAEV.

Bonde Viktor, svedo, bindisto. Nask. 8 marto 1892 en Falun. Pacifisto, abstinenculo. E-isto de 1916. Kursoj; gvidado de la koresponda kurso de SEF, 1927—32. Del. de UEA, 1919—29. Tradukoj el la sveda en Svenska Arbetar E-isten ktp.

Bonhumoraj Rakontoj de J. Korczak, el la pola trad. Anna Weinstein. 1927, 64 p. »Sangaj satiroj. La verkisto bonege konas la homan animon kun ĉiuj virtoj kaj malvirtoj. La traduko estas tre klara«. (J. F. J., La Socialisto, 1927, p: 80.)

Bonnet (bone) Fanny, francino, prof. de angla lingvo kaj de stenografio. Nask. 9 sept. 1870 en Paris. E-iĝis en 1903. Kas. de SFPE de 10 jaroj, komitatanino de la »Fédération Universitaire Espérantiste de France«.

Bonnevie (bonevi) Honoratus, norvego, licenciato de filologio, pensulo. Nask. 19 okt. 1853. Studis ĉe la universitato filologion, precipe latinan, germanan, grekan kaj pranorvegan lingvojn, okupiĝis pri kalendaraj demandoj, verkis libron pri la problemoj. Eklernis E-n 29 okt. 1906. Prez. de EK en Oslo kaj sekr. de NEL. Ĉefred. de NE-isto 1912—14, kunred. 1915—20, 1922—24, kaj dum 1932. Tradukis literaturajn kaj kunverkis lernolibrojn.

Bontemplanoj, v. Senalkohola kulturo.

Booth (budh) Norman, anglo. Nask. 9 apr. 1894 en Netherpton, Huddersfield. Estro de skolta grupo. Dum 10 jaroj ĝen. sekr. de Skol-

ta-E-ista Ligo. Verkis multajn artikolojn pri E kaj skoltismo.

Bord (bor) Emile, franco, prof. Nask. 15 febr. 1858, mortis 23 sept. 1919. Fondis grupojn, faris multnombrajn paroladojn kaj varbis membrojn centope, de 1904 ĝis sia morto. Verkis prop. monologojn.

Borel Emile, franco, radiostaciestro de Lyon (la Doua). Nask. 27 apr. 1884 en Lyon. Fervore propagandis, kaj nome ĉe la radiostacio, kiun li direktas. Lia edzino estas unu el la fondintoj de la feministoj ES: UDEV.

Borel Jean, (ps. J. B.; D. Spero), sviso, publicisto, eldonisto. Nask. 23 aŭg. 1868 en Couvet. Studis diversajn sciencojn, precipe historion kaj ĵurnalismon. Fariĝis E-isto en sia patrolando, kunfondinto de Svisa ES, 1902. En 1903 estis unu el la unuaj kaj plej fervoraj iniciatintoj por E en Germanujo. Kunfondinto de »E Verlag Möller kaj Borel«, 1903 kaj de Berlina EG, 1903. Fondinto kaj red. de GE-isto, 1904. L. K. de 1905. Verkoj: germanlingva lernolibro, en 10 eldonoj, 100.000 e-roj, 1904—10; broŝuro en 250.000 e-roj, 1903—10. Fondinto kaj red. de E Biblioteko Int., kies plurajn volumojn li verkis aŭ tradukis, ekz. Sub la neĝo de Porchat el la franca. Franclingvaj verketoj kaj artikoloj pri E.

Borel Jules, sviso, eldonisto, trato de B. Jean. Nask. 14 nov. 1873 en Couvet. De 1900 direktoro de la presejo kaj eldonejo Möller kaj Borel, Berlin. Prop-isto kaj estrano de diversaj E societoj.

Borisov Nikolaj, sovetiano, ruso, verkisto. Nask. 11 okt. 1889. Aŭtoro de la fama filmromano »Ukrazio« (pri la epoko de civil-milito en Ukrainlando 1919) kaj de la teksto por opero »Ferenĝio«, multfoje prezentita en opereatroj de Ĥarkov, Odessa, Tiflis, Taŝkent kaj aliaj urboj de Sovetunio. Malnova E-isto. Ankorau en 1914 en Odessa aperis lia unua libro en E Intima parolad', poezio de ego-futurismo, unika dokumento de futurismo en E. En 1931 aperis ukrainlingve lia romano Kvint, verkita en stilo de aventurodetektiva filmromano, laŭ materialo

de int. laborista E-korespondado. La romano vigle agitas por E kaj rekomendas la aŭtoron kiel majstron de interesa temo. En E li verkis originalan novelaron *La hundo de Lia Majesteco* k. a. En 1931 B. estis ĉefiniciatinto de IAREV.

Borovko Nikolaj Afrikanoviĉ, ruso, unu el la unuaj pioniroj en Ruslando. Nask. 1863 en Zaslave (Volinia gubernio), mortis 1913 en Simferopol (Krimo), Ricevis militedukon, sed la aresto kaj ekzilo en Zajsan (Siberio) interrompis lian militkarieron. Plue li laboris nur kiel privatinstruisto kaj ĵurnalisto. B. fariĝis E-isto en la ekzilo en la unuaj jaroj de E movado. Post finiĝo de l' ekzilo, li loĝis en Odessa kaj tie vigle partoprenis la propagandon de E. Li tradukis *La ŝtona Gasto de Puŝkin*. (1895), kunlaboris en *La E-isto kaj l' redaktis Jarlibron E-istan* (Upp-sala, 1897). Laŭ demando de B., Z skribis al li en 1895 (?) sian faman leteron pri la deveno de E. En 1895, edziĝinte kun E-istino A. Ĉajkovskaja, B. transloĝiĝis Peterburgon kaj tie daŭrigis sian E-agadon. Post ekziĝo de F. Kanaloŝŝv-Lefler, B. estis elektita prez. de la Socio «Espero»/1896—97. En 1911—12 B. energie disputis kontraŭ Gaston Moch por fonetika skribado de propraj nomoj en E.

Borovko-Ĉajkovskaja Antonina Justinovna, rusino, nask. 1872 en Simferopol (Krimo) kaj tie lernis en gimnazio. E-istino de 1890, kiam ŝi konatiĝis kun N. Borovko. En 1893 ŝi iniciatis, eldonis kaj dissendis alvokon, aprobitan de Z, kontraŭ la reformoj en E postkiam Trompeter rifuzis presigi ĝin en «*La E-isto*». En 1895 ŝi akompanis tra Krimo kiel E-gvidisto la svedajn E-istojn V. Langlet kaj Etzel, kiuj entreprenis unuan vojaĝon per E tra Ruslando. Tiun unuan aplikon de E en praktiko B. priskribis en la revuo «*Nedelja*». Poste ŝi prelegis pri E en vaporŝipoj krozantaj inter Odessa kaj Jalta, organizis loterion por la gazeto «*l'* multe propagandis E-n kaj varbis interalie la faman verkiston V. G. Korolenko.

Bosque y Carbonell Antonio, hispano, telegrafestro en Alcira. De 1908 seninterrompe UEA-del.

Boucon (bukon) Herman, franco, prof. Nask. 4 okt. 1856 en Villars-Saint-Georges (apud Besançon). E-isto de 1898. En 1902 post multaj klopodoj fondis en Anney (Savoie) unu el la unuaj francaj grupoj. Multaj artikoloj en diversaj gazetoj, ofte subskribitaj H. B. Gramatikisto, li batalis energie kontraŭ reformemuloj. Verkis tradukon de Molière: *La Mizantropo*, en amfibrakaj versoj, (1930). LK de 1909.

Boulet (bu'le) Paul, franco, supera administranto de la Doganoj ĉe la Ministro de la Financoj. Nask. 2 jan. 1884 en Brebières (apud Arras). E-iĝis en 1902. Sekr. de la organiza Komitato de la 1-a UK, 1905. Kunfondis la grupon de Rouen, gvidis kursojn, kunlaboris en la Revuo. Verkis: kun Michaux: *Méthode pour apprendre seul l' E*, (1905). Sola: *Kongresa Libro*, 1905. — Franca Gramatiko por E-istoj 1907. — *Tri Monologoj*, 1907 — *Dumil novaj vortoj*, 1909. Kunlaboris kun Cart en F-E kaj E-F vortaroj. — LK, 1909; ekziĝis pro troa laboro.

Boulogne-sur-Mer (bulonj-sür-mer, en E-a formo Bulonjo apud maro), urbo en Norda Francujo; 55.400 loĝantoj, la urbo de la 1-a UK, 7—12 aŭg. 1905, kiun ĉeestis 688 E-istoj el 20 landoj. — La unua int. kunveno, kvazaŭ antaŭkongreso okazis en Calais (v.), kie precipe francoj kaj angloj kunvenis. Estis eksperimento, ĉu diverslingvaj E-istoj reciproke sin komprenas. Ĉar la provo bonege sukcesis, oni decidis kunvoki pli grandstilan kunvenon por proksima jaro en B. Dum la preparoj eksplodis la milito inter Japanujo kaj Rusujo kaj estis danĝero kaj eĉ famo, ke Z ne povos partopreni. Felice la kaŭzo de la famo estis nur ke lia pli juna frato devis militservi. Jam antaŭ la kongreso en la gazetoj ekestis diskuto pri organizaj demandoj, precipe en L. I. (1904, p: 271.) en kiu partoprenis krom Z ankaŭ Capé, Bourlet, Moch. Ankaŭ la fama Deklaracio (v.), pli bone la projekto de ĝi,

jam aperis en L. I. en julio 1905. Jam antaŭ la kongreso en Paris okazis int. kunvenoj; ili komenciĝis per neatendita vizito al grupvespero en Sorbonne de gesinjoroj Z; ĉeestis jam kelkaj eksterlandaj kongresanoj. Proksimajn tagojn okazis disdonado de premioj per Z por plej talentaj lernantoj en Paris, int. E-koncerto, solena akcepto de Z kaj de la kongresanoj en urba palaco. La ĉefa karaktero de la kongreso estis la persona interamikigo de la propagandistoj, festenoj, koncerto kun dek-lamo de diversnaciuloj. Dum tia koncerto laŭlitere »malantaŭ la kulisoj« Z kaj siaj amikoj preparis la finfinan redakton de la Deklaracio ĉiesvoĉe akceptita la sekvantan tagon. Plej gravaj okazintaĵoj: malferma kunsido en la urba teatro, la fama parolado de Z, unua publika parolado, je kies fino li deklamis la preĝon sub la Verda Standardo; ludado de »Mensogo pro Amo« de Labiche. Proksiman tagon (dimanĉe) katolika diservo (meson faris abato Peltier); naciaj preparaj kunvenoj; tagmeze ekskurso al Wiméreux; vespere koncerto; ludado de »Kontraŭvola edziĝo« de Molière, la roloj luditaj de anoj el sep diversaj nacioj. Lunde: laborkunsido, akcepto de Deklaracio, festena kunveno por 300 E-istoj, fratiĝo inter katolika kaj protestanta pastroj (Peltier kaj Schneeberger). Vespere balo en kostumoj, naciaj dancoj. Pluraj kunsidoj pritraktis la allason de E por telegramoj, la int. organizon, la elekton en Lingvan Komitaton. Okazis kritiko kaj klarigoj de Z pri prononcado, en kiu partoprenis multaj E-istoj. Privat parolis pri propagando inter junularo kaj Borirac, la prezidinto, klarigis la plej taŭgan procedon por enkonduki E-n en la programon de lernejoj. Sekvis vojaĝo al angla marbordo Dover, proksiman tagon solena fermo de la kongreso. Dum la kongreso okazis ankaŭ la inaŭguro de la E-a s t a n d a r d o (v.)

O. SIMON.

Bourlet (burle) Carlo, franco, d-ro de sciencoj, prof., scienculo. Nask. 25 apr. 1866 en Strasbourg, mortis 12 aŭg. 1913 en Ancecy (Savoie) pro malbonŝanca engluto de fiŝosto. De

1906 estis prof. de mekaniko en la Konservatorio de Artoj kaj Metioj en Paris. Fama kaj klera matematikisto, li ĉiam laboris por pliproksimigi al la praktika vivo la puran sciencan kaj la sciencan instruadon, por igi ĝin plej utila. Lia verkaro entenas multajn raportojn, kompletajn kursojn pri Aritmetiko, Algebro kaj Geometrio, uzitajn en preskaŭ ĉiuj liceoj de Francujo, kaj eĉ ekster Francujo; pli ol dudek verkojn pri puraj kaj aplikitaj matematikoj, el kiuj kelkaj estas aŭtoritataj, speciale pri biciklo, haltigiloj, k. a. Li estis ano de la teknika komitato de »Touring-Club de France«. De 1903 li direktis, kun Laisant kaj Bricard, la revuon »Nouvelles Annales de Mathématiques«. B. interesiĝis al E dank' al la persistemo de prof. Méray, kiu varbis lin en 1900. En tiu tempo la Grupo Pariza ekzistis de nur ses monatoj kaj kalkulis tridek membrojn; ĝi havis nek publikajn kursojn, nek kunvenojn, kaj malgraŭ la klopodoj, faritaj de la unuaj pioniroj E estis konata en Francujo de apenaŭ kelkcentoj da personoj. B., tuj post sia aliĝo, dank' al sia alta scienca situacio, al sia rimarkinda laborpovo, al sia senlima sindonemo, rapide donis decidan antaŭenpuŝon. — Kun la helpo de kelkaj eminentaj amikoj li ricevis la apogon de la franca grava societo »Touring-Club«, kaj en majo 1901 komencis en ĝiaj salonoj kurson de E. Ĉe la unua leciono li nenion sciis pli ol siaj lernantoj, sed la lernanto-profesoro faris rapidajn progresojn. La 17 jul. de la sama jaro li akceptis la prez. de la Pariza grupo, kaj de tiam la E-a movado rapide disvastiĝis en Francujo, kaj ankaŭ eksterlande. — Ricevinte dank' al sia persona influo kunvenajn ĉambrojn en la Sorbonne por la Grupo Pariza kaj la helpon de la grava eldonista firma Hachette por la publikigo de E-aj libroj, li ekorganizis la propagadon en Francujo kun la apogo de »Touring-Club«. De 1902 la paroladoj kaj kursoj pli kaj pli multiĝis. Kun juneca fervoro, kun konstanta bonhumoro kaj mirinda agemo li prenis sur sin preskaŭ la tutan laboron. En la urboj de provinco, kie

oni povis organizi paroladon, li sukcesis krei kursojn kaj grupojn, dank' al sia simpla elokventeco, al sia forto de konvinko. En 1902 li fondis 19 novajn grupojn. — La Pariza Grupo mem senĉese prosperis per la fondo de sekcioj, la publikigo de bulteno Paris E, la organizo de monataj vespermanĝoj, de konkursoj kun disdonado de premioj en la Sorbonne, ktp. kaj baldaŭ ĝi kalkulis pli ol mil membrojn. Sed B. plivastigis ankoraŭ sian agadkampon. En sept. 1906 li fondis La Revuo-n, kiun li direktis kun neimagebla zorgo. Li organizis la Florajn Ludojn, verkis artikolojn en la francaj ĵurnaloj, »habilis« en la Revuo, helpis al ĉiuj, ricevis centojn da leteroj, senlace respondis, starigis la Komisionon pri Propagando en la Franca Societo, vicprezidis la Konstantan Komitaton, helpis al la organizo de la kongresoj en Cambridge, Dresden kaj Barcelono, unuvorte dediĉis al E pli ol duonon de sia vivo. — Z diris ĉe lia tombo: »Oni multe laboris por E ankaŭ antaŭ Bourlet, sed de la momento, kiam li aliĝis al nia anaro, en nian aferon enverŝigis ia nova energio. Al lia senlaca iniciatado, instigako kaj helpado ni ŝuldas grandan riĉigon de nia literaturo kaj aperon de plej gravaj verkoj pri kaj en nia lingvo; al lia iniciato kaj energia laborado ni ŝuldas la fondigon de gravaj institucioj, kiel ekzemple la »Int. Scienca Asocio«. Krom siaj multegaj artikoloj li verkis kelkajn prop. broŝurojn kaj paroladojn; li publikigis la gramatiketon »broŝuro ruĝa«, (pli ol 500.000 e-roj estas ĝis nun disdonitaj) — L. K. de 1905. L. BASTIEN.

Bouška Hynek Karel, ĉeĥo, komunuma oficisto en Praha. Nask. 2 marto 1884 en P. E-isto de 1901. Kunfond. de la Praha EK. E-lingva aŭtoritato inter ĉeĥoj. Kunlaboranto de La Progreso, estis red. de Ĉeĥoslovaka Gazeto, de Bohema E-isto. Artikoloj en diversaj ĉeĥaj gazetoj pri E, kaj ankaŭ pri la Delegacio. Verkoj: la politika Slovako kaj Magiaroj, 1908; Ĉeĥoslovaka E-lernejo; Lingvaj Respondoj, 1933.

Boutwood (baŭtŭud), John J.,

anglo. Nask. 14 nov. 1860 en Luton. Komercista sekretario. Gvidanto de la Societo por Helpo al Patrinoj kaj Infanetoj. E-istiĝis 1912. Vicprez. de BEA. Prez. de grupo Hastings. Verkis kelke da prop. teatraĵoj.

Bouvier (buvie) Louis, franco, farmaciisto en Poix. De 1908 seninterrompe UEA-del.

Bouvier Paul, franco svisa, kasisto, UEA-del en Genève. Verkis Genève o, 1925, kunlaboris je »E« kaj Jarlibro de UEA.

Boxhammer (bokshamer) Marta, germanino. Nask. 14 marto 1882 en Sänits Kreis Rothenburg, mortis 30 nov. 1931. Estis pioniro de la laborista E-movado.

Braga Ismael Gomes, brazilano, librotenisto. Daŭra propagando en spiritistaj rondoj, artikoloj en pluraj gazetoj.

Braund Roman, (ps. Oresto Golovnin), ruso germandevena, univ. prof. pri slavaj lingvoj, aŭtoro de multaj sciencaj verkoj. Nask. 16 dec. 1853 en Petrograd, mortis en Moskva 1920. B. estis konata ankaŭ kiel E-a kaj rusa poeto, aŭtoro de originalaj kaj tradukitaj fabeloj, eld. 1886, 1899 kaj 1910. En 1908 li ellaboris propran projekton de universala lingvo »Romanizat« kaj en 1909 kompromisan reformon inter E kaj Ido. Tamen jam post unu jaro B. rezignis tion kaj farigis unu el la plej aktivaj partoprenantoj de la rusa E-movado. En 1914 kontraŭbatalis ŝovinistan haladzon en universitataj rondoj. En 1917 faris grandan tunebran publikan paroladon pri Z en Moskva Universitato.

Brauer Karl, estono, eksinstruisto, nun supera impostinspektoro en Tallinn. E-isto de 1928. Estrarano de EAE, ETK ktp.

Braun Franz, aŭstro-germano, iama financa ĉefadministranto, en Rodaun ĉe Wien. De multaj jaroj funkciulo en UEU-Wien. Kunlaboranto de Aŭ. E-isto.

Braun Stanislaw Zygmunt, (ps. Wiktor Elski), polo, oficisto. Nask. 25 jun. 1893 en Czenstochowa. Originalaj poeziaĵoj. Verkis: Unuaj agordoj, 1910 (kune kun poemoj de Eska, S. Karolczyk.)

Brazila Esperantisto. Organo de BLE, fondita 1908; formato 27.5×18 cm.

Brazilo. Sur tiu vastega etendaĵo oni parolas la solan lingvon portugalan; dum granda permara aŭ surtera vojaĝo, kiu povas daŭri ĝis dekoj da tagoj, oni ne trovas, kiel en Eŭropo, la diversecon de idiomoj, kiu malebligas la interkompreniĝon. Krom tio, en la linnajbaraj landoj estas parolata la hispana lingvo, idiomato apartenanta al la sama familio-branĉo, kiel la portugala. Kaj, se estas vere, ke en Eŭropo hispanoj kaj portugaloj ne ĉiam sin interkomprenas, en la hispan-amerikaj landoj, kie la prononcado de la du lingvoj estas iomete modifita, la homoj de meza kulturo sin ordinare bone interkomprenas, eĉ se ĉiu parolas sian hejman lingvon. Brazilo estas lando de enmigrado: estas do nature, ke la fremdulo, tien ĉi veninta por fiksi loĝejon, penas eklerni la lingvon de sia nova loĝloko. La negocoj pri la ĉefa eksportkomercaĵo — la kafo — estas farataj en la brazilaj negocejoj pere de la portugala lingvo. Pri la importkomerco, la fremdaj vendistoj uzas plej ofte, pro sia intereso mem, la lingvon de la brazilaj aĉetantoj. La turismo ekkreskas nun dank' al la koncertaj penoj de la Registaro. Nur malmulte da fremdlandanoj venadis antaŭ hodiaŭ viziti Brazilon, kaj eĉ tiuj malmultaj venis preskaŭ ĉiam el la plej proksimaj landoj, t. e. el la hispanlingvaj nacioj. Estas cetere konata fakto, ke en la novaj landoj, travivantaj ankoraŭ sian epokon de formiĝo, oni ordinare ne atentis kiel gravan aferon la kulturfakojn, kiuj ne havas praktikan aspekton kaj monan valoron. La kleraj homoj studas la francan kaj la anglan lingvojn, la germana kaj la itala estas ankaŭ scipovataj de multaj studemuloj, kiuj devas ilin studi por legi verkojn de siaj respektivaj fakoj (la medicino, la jurscienco ktp.). Ĉar la portugala lingvo ne estas tiel disvastigita kiel la cititaj, tial ne estas malfacile konvinki kulturitan homon pri la teoria utileco de E. Tio klarigas tiun gravan helpon, kiun E jam delonge ricevas de klarvidaj homoj. Estas certe, ke,

se ne ekzistus la supre cititaj malhelpoj, tiu subteno estus jam haviginta al E rimarkindajn rezultatojn por ĝia definitiva kaj brila triumfo en la lando.

La unua brazila E-isto estis d-ro Baggio de Araujo, supera juĝisto en Stato Rio de Janeiro, kiu sciis E-n jam en 1896, ĝin uzadis por sia korespondado kun fremdlandaj E-istoj kaj pri ĝi skribadis en la gazetaro. A. C. Coutinho, kiu faris grandan servon al E tradukante la »Unuajn Lecionojn« de Cart en la portugalan lingvon, ŝuldas sian E-iĝon al d-ro Baggio de Araujo. Jam en 1897 la revuo „L'« havis unu abonanton en Santos, nome F. P. Machado Reis, kaj K. Ostanoviĉ korespondadis kun F. da Silva, loĝanta en Sao Feliciano. Kredeble tiu ĉi lasta estis varbita en la movadon pere de Valdomiro Lorenz, klera ĉefo, loĝanta en Sao Feliciano depost 1896; (iam fervora E-isto Lorenz aliĝis al Ido, revenis al E kaj antaŭ nelonge akceptis Nov-E-n de Saussure).

En 1898 Medeiros Albuquerque, tre konata diverstema verkisto, kaj de tiam simpatianta E-n, skribis en »Revista Brasileira« (15 apr.) artikolon titolitan »Lingvo int. E.« La helenisto barono Ramiz Galvao publikigis en 1903, en la grava »Garnier almanako«, kies direktoro li mem estis, artikolon pri E. En 1905 anekdotojn en E publikigis la gazeto »O Cinzel« (La Ĉizilo), en urbo Ubá. En tiu sama jaro aperis en gazeto de Porto-Alegre (19 apr.) artikolo de C. Kraemer »Solresol kaj E«, kaj en gazeto »Raio X«, de tiu sama urbo, du artikoloj (31 aŭg. kaj 30 nov.). Ĉirkaŭ tiu epoko Reinaldo Geyer, en Porto-Alegre, skribadis en E-gazetoj artikolojn pri Brazilo.

Pluraj elmontroj por E estis do registrataj, precipe en Rio de Janeiro, Rio-Grande-do-Sul kaj Minas-Gerais, sed ĉiuj tiuj E-istoj agadis izole, sen ia komuna asocio por la organizado de sistema propagando.

Nur 7 marto 1906 d-ro Joao Keating, helpata de sindonaj amikoj, fondis en Campinas la unuan E-gru-

pon »Verda Stelaro«, kiu ne ekzistas plu. Ĉar la grupo ne havis propran gazeton, ĝia fondo estis diskonigita al la brazilaj E-istoj pere de la fremdlandaj gazetoj, precipe per »L' E-iste«.

En la lastaj tagoj de majo 1906 d-ro Everardo Backheuser komencis per la gazeto »O País«, dank' al la granda ĵurnalistoj Alcindo Guanabara, serion da E-lecionoj.

Kiam Backheuser komencis la lecionojn pri la lingvo int., tiu ĵurnalo publikigadis jam de kelka tempo kursojn pri la franca kaj angla lingvoj; post la tria aŭ kvara leciono li komencis ricevi lernejojn, skribitajn de personoj, kiuj antaŭ la kursostarigo sciis nenion pri la lernota lingvo. En tiuj lernejoj estis malmulte da eraroj, kaj, kontraŭe, la malmultaj lernejoj redaktitaj en franca aŭ angla lingvo venis al la respektivaj instruantoj preskaŭ nelegeblaj, pro la multaj eraroj.

Animite de la sukceso de tiu propagando, d-ro Backheuser proponis la fondon de E-Klubo. Lia ideo estis entuziasme akceptita, kaj granda nombro da homoj enskribiĝis kiel anoj. La 29 junio pli ol 100 personoj kunvenis en la sidejo de »O País« kaj tie fondis klubon, kiu ricevis la nomon »Brazila Klubo E« (BKE). Estis aklande nomita la jena estraro: prez. d-ro Backheuser; vicprez. d-ro Nuno Baena kaj d-ro Nerval de Gouveia; sekr. Lauriano das Trinas; kas. Honório Leal.

BKE, kiu ankoraŭ vivas kaj estas la plej aktiva en Brazilo, komencis sian agadon efektive brilan serion da paroladoj kaj malfermantaj kursojn en diversaj oficialaj lernejoj (Nacia Gimnazio, »Pedagogium«, Milita Kolegio). Krome en apartaj lernejoj kaj en asocioj (Spencer Lernejo, Colomy Club, Asocio de Komercistoj ktp.).

Sekvis baldaŭ la fondo de aliaj grupoj en Rio de Janeiro: »Verda Stelaro«, Laboristara Grupo E-ista kaj Societo Brazila E-ista.

Proksimume ĉe tiu epoko alvenis al Rio de Janeiro la franca E-isto Paul Berthelot; tiam la lokaj

E-istoj, kun tute prava emocio, povis la unuan fojon provi siajn praktikajn konojn kaj certigi pri la ĝusteco de sia prononcado. Berthelot tre helpis la propagandon, farante kursojn per la rekta metodo, ĉar li ja ne sciis la portugalan lingvon. Li mortis en la interno de Brazilo, Conceição do Araguaia en 1910.

La unua ago de la registaro subtene al E estis la decido de la Ministro de Publikaj Laboroj, d-ro Lauro Müller, kiu en nov. 1906 deklaris E-n »lingvo klara« por la telegrafado en Brazilo. Kunhelpis al tio Medeiros e Albuquerque, tiama prez. de BKE. Brazilo estis la unua kiu faris tian decidon.

En apr. 1907 ekaperis la Brazila Revuo E-ista, kies unuaj redaktoroj estis Alberto Vieira, Geyer kaj Backheuser kaj kiu en sept. 1908 ŝanĝis sian nomon je Brazila E-isto. Kiel oficiala organo de Brazila Ligo E-ista, ĝi estas ankoraŭ publikigata.

La serio de la naciaj kongresoj de E komenciĝis 13 jul. 1907, kiam en Rio de Janeiro estis inaŭgurata la 1-a Kongreso, kies solena malferma kunsido estis prezidata de la Ministro de Interno mem, d-ro Tavares de Lira.

Tiu Kongreso decidis la fondon de la Brazila Ligo E-ista (BLE), por kunigi ĉiujn grupojn. De tiu tempo aliĝis al la Ligo 81 grupoj, el kiuj multaj havis efemeran ekziston. La unua estraro de la Ligo konsistis el Backheuser, prez. Reinoldo Geyer, sekr., Manuel Paiva Araujo, kas.

Ĉe la sekvintaj kongresoj regis, kiel ĉe la unua, granda entuziasmo; ili estis la jenaj: 2-a, en Sao Paulo (1909); 3-a, en Petrópolis (1910); 4-a, en Juiz de Fora (1911); 5-a, en Rio de Janeiro (1913); 6-a, samloke (1921); 7-a, samloke (1923); kaj 8-a, en Vitória (1926). Ilin ĉiujn ĉeestis reprezentantoj de pluraj ministroj kaj de prezidantoj de la ŝtatoj; la federaĵa registaro helpis materiale tiujn kongresojn, konsentante al ilia estraro senpagan telegrafadon pri la kunveno kaj, ankau, senpagan veturadon al la kongresanoj, kiuj sin direktis

al la kongreslokoj ekster la ĉefurbo. Al la 7-a la prezidanto de la respubliko, d-ro Artur Bernardes, irigis oficialan reprezentanton al la solena malferma kunsido, kaj la ministro de interno, d-ro Joao Luiz Alves, ĝin persone prezidis. Ĉe la 8-a, la registaro de ŝtato Espírito Santo akceptis la kongresanojn kiel oficialajn invititojn kaj pagis tute la elspezojn, kiujn ili faris kiel ŝtataj gastoj.

Krom la cititaj oficialaj agoj, la brazila registaro ĉiam elmontras sian subtenon al E en diversaj manieroj.

Okaze de la Nacia Ekspozicio en 1908, la grava »Memoriga Bulteno de l' Ekspozicio« estis presata en tri lingvoj: portugala, franca kaj E; kaj ĝia antaŭparolo estis publikigata aparte en E. E estis ankaŭ uzata por la oficiala propagando de la Int. Ekspozicio en 1922. Tiu ekspozicio kontraktis kun la gazeto »E Triumfonta« la publikigon de speciala numero por propagando de Brazilo. Sekve de tiu propagando estis ricevataj centoj da leteroj kaj kartoj, kun peto pri informoj, kaj multo da fremdaj gazetoj, kiuj publikigis sciigojn, donitajn de la E-istoj, en la respektivaj lingvoj. Ĉe la du cititaj ekspozicioj BKE ricevis oran medalon pro la prezentitaj E-ajoj.

La leĝo n-ro 1.162 de la 29 okt. 1913, permesis la sendevigan instruadon de E en la lernejoj de ŝtato Rio de Janeiro. Per la dekreto n-ro 1.165, de 31 okt. 1917, strato Maria José, en Rio de Janeiro estis eknomata Z. En Brazilo ekzistas du ŝtatoj kun la nomo E: en Reaŝengio, antaŭurbo de Rio de Janeiro, (depost 5 okt. 1913), kaj en Aracaju, (depost 23 marto 1932). La leĝo n-ro 759, de la 31 okt. 1918, permesis la sendevigan instruadon de E ĉe la Normala Lernejo kaj ĉe la duagrada lernejoj de ŝtato Sergipe. La dekreto n-ro 2.083, de la 11 jan. 1919, permesis la sendevigan instruadon de E ĉe la unuagrada; metiaj kaj normalaj lernejoj de la Federacia Distrikto.

Per dekreto n-ro 4.356, de 26 okt. 1921, BLE estas konsiderita asocio de publika utileco. Kiam la

estraro de la Ligo iris danki Epitácio Pessoa, prezidanton de la respubliko kaj unu el la plej eminentaj brazilaj politikistoj, li deklaris, ke li estas sincere konvinkita pri la utileco de E por la homaro, danke ĝian logikecon kaj facilecon, kiujn li mem konstatis.

En 1922 la Brazila Parlamento voĉdonis subvenciojn al la Ligo. Tiu subvencio estis komence en valoro de ĉirkaŭ 760 svisaj frankoj, malpliigis poste, pro la ekonomie malfacila situacio de la lando, je la hodiaŭaj ĉ. 380 svisaj frankoj. En sia parolado ĉe la 7-a Kongreso, la ministro de interno atentigis al la valoro, plie morala ol materiala, de tiu helpo. La nuna provizora registaro, faranta rigoran ekzamenon pri ĉiuj subvencioj, forstreks plurajn, sed tenis plu tiun al la Ligo.

La brazila registaro elektis oficialajn reprezentantojn ĉe la jenaj UK-j 5-a: Vieira Souto, 6-a: Melo e Sousa, 7-a: ing. Agenor de Miranda, 18-a: d-ro Carlos Domingues, 20-a: prof. E. Backheuser, 21-a: Domingues, 22-a: konsulo Joao Carlos Muniz kaj 24-a: Eliseu Montarros.

La Brazila Delegito ĉe la Ligo de Nacioj, d-ro Rodrigo Otávio, estis unu el la subskribintoj de la propono, ke tiu Ligo rekomendu la instruadon de E en la lernejoj.

La Supera Oficejo de Statistiko, Diskonigado kaj Propagando de la Ministerio de Edukado uzadas E-n por sia oficiala korespondado.

La plej granda sukceso de E ĉe la publikaj lernejoj en Brazilo estis atingita en 1918, jaro, kiam funkciis kursoj ĉe pli ol 20 lernejoj, vizitataj de pli ol 600 gelernantoj. La E-lecionoj estis donataj tuj post la aliaj, je la 15-a ĝis la 16-a horo. La plinombriĝo de la lernantaro kaj la malebleco konstrui pli da lernejoj devigis la administrantaron starigi du lerntempojn, nome de la 8-a ĝis la 12-a, kaj de la 12-a ĝis la 17-a. Iĝis do tre malfacile daŭrigi la E-kursojn, malgraŭ la granda volenteco de la lernejestroj. Tamen, dum kelkaj sekvintaj jaroj ankoraŭ funkciadis certa

nombro da kursoj por geinstruistoj, kaj por lernantoj.

En 1929 la Supera Direktantaro de la Publika Instruado de Federacia Distrikto adoptis E-n por la antaŭ ne-longe starigita servo de Lerneja Internacia kaj -ŝtata Interŝanĝo, servo, kiu tamen ankoraŭ ne ricevis sian plenan forton.

En 1932 funkciis, rajtigite de la Ministro de Edukado, resp. de la Direktoro de Publika Instruado en Rio de Janeiro, kursoj de E ĉe la Ekster- kaj Internula Fakoj de Lernejo Pedro II (modelo de ĉiuj duagradaĵoj lernejoj en Brazilo), ĉe la Instituto de Edukado, kiu diplomas la unuagradaĵojn geinstruistojn en la ĉefurbo, kaj ĉe la »Grupo Escolar Rodrigues Alves«.

En tiu sama jaro estis kreata katedro de E ĉe la Populara Laboruniversitato, en Recife, por kiu estis nomata instruanto la sindona E-isto Sebastiao Albuquerque.

De 1925 ĝis 1928 E estis deviga objekto ĉe la komercolernejo tiam tenata de la Asocio de Komercoficistoj de Rio de Janeiro, la plej grava klasasocio en Latina Ameriko.

Pluraj sciencaj, komercaj, edukaj, geografiaj kaj turismaj kongresoj pli ol unu fojon, jam aprobis deziresprimojn favorajn al E.

Multaj eminentuloj simpatias E-n. La peticion kiun BLE sendis 10 aŭg. 1921 al la Ligo de Nacioj, subskribis pli ol 200 kleraj homoj en Rio de Janeiro.

Faris paroladojn, skribis artikolojn, aŭ helpis en iu alia maniero la propagandon, krom la supre cititaj, la jenaj kleraj brazilanoj: Silvio Romero, filozofo, Olavo Bilac, princo de la brazilaj poetoj; Barbosa Lima, oratoro; Fortunato Duarte, latinisto; Carlos Porto Carreiro, poeto kaj lingvisto; Markizo de Paranaguá, scienculo; Barono Homem de Melo, geografo; Nerval de Gouveia, prof. ĉe kelkaj superaj lernejoj; la cititaj jam mortintaj; kaj: Otávio Mangabeira kaj Felix Pacheco, iamaj ministroj de eksterlandaj aferoj; generalo Cândido Rondon, geografo kaj landesploristo; Antônio Carlos, politikisto; Moreira Guimaraes, filozofo; Afonso Pena Jú-

nior, iama ministro de interno; Cândido Mendes de Almeida, dir. de la Komerca Akademio; Altonso Celso, membro de la Brazila Beletristika Akademio; M. A. Teixeira de Freitas, dir. ĉe la ministerio de edukado; la prelatoj Benedito Marinho kaj Gonçalves de Rezende, sanktatemaj oratoroj; Dunschee de Abranches, publicisto; Manuel Cicero, iama rektoro de la univ. de Rio de Janeiro; José Oiticica, filologo; Raul Pederneiras, prof. de int. juro; Juliano Moreira, scienculo; Heitor Beltrao, ĵurnalisto; ing. Aarao Reis; José Boiteux, historiisto kaj multaj aliaj.

Ĉiam montras sian simpatian al E ankaŭ gravaj asocioj: Societo de Geografio de Rio de Janeiro (en kies domo estas la sidejo de BLE), Klubo de Inĝenieroj, Societo de Medicino kaj Ĥirurgio, B. Historia kaj Geografia Instituto, Nacia Societo de Terkulturo, B. Gazetara Asocio, B. Instituto de Kontoscienco, B. Botanika Asocio, Komerca Asocio de Rio de Janeiro, Federacio de la Komerciaj Asocioj de B., Asocio de Komercoficistoj de Rio de Janeiro, Ligo de Komercio, Touring Club de B., B. Katolika Unuiĝo, Federacio de B-aj Skoltoj, B. Spirita Federacio, B. Radio Klubo, Radio Societo de Rio de Janeiro, k. a.

Krom la naturaj malfacilaĵoj, kiujn ni aludis ĉe la komenco, estu registritaj du malagrablaj faktoj en la historio de E en Brazilo. La unua estis la kontraŭstaro, ĉe la Ligo de Nacioj, de la Ministro de Brazilo en Svisujo, kiu okaze reprezentis Brazilon en unu el la konferencoj kaj kiu, ne ricevinte instrukciojn, atakis E-n. BLE sin turnis al li kun vigla protesto, memorigante al li, ke la registaro ĉiam animis la E-movadon. La dua fakto okazis en 1924, kiam BKE estis avertita de amiko pri tio, ke ne estus konvena la daŭrigo de E-kurso tiam farata per la radio, ĉar la registaro estis informata pri tio, ke la E-movado celas la reverŝon de la institucioj. BKE ĉesigis dum kelka tempo tiun kurson, sed poste tiu ĉi daŭris plu sen iaj ajn malhelpoj.

Kurioza kaj aparta aspekto de E

en Brazilo estas, ke tiu idiomo estas ĝenerale tie ĉi konsiderata kiel la int. helpilingvo. Ekzistis aŭ ekzistas en Sao Paulo kelkaj idistoj, sed ilia propagando — se ĝi efektive ekzistas — trovas nenian resonadon. Pri aliaj projektoj nur malmultaj personoj scias.

En 1907 estis kelkaj opinioj inklinaj al la reformo de E. La granda plimulto, tamen, estis malfavora al tiu intenco, kaj tial venkis la partianoj de la Fundamento-konservado.

La gazetaro akceptas volonte sciigojn pri E. Inter niaj gazetoj ni aparte menciuj »Jornal do Comércio«, la plej grava en Brazilo.

Estis interesa elmondo de la simpatio, ke la 3 marto 1930, dank' al la ĝentileco de »Companhia Radio-telefónica Brasileira«, la prez. de BLE, C. Fernandes, interparoladis kun dir. de »La Movado« en Paris, E. Houbart. La unuan fojon okazis, kiam du personoj rekte interparoladis per senfadena telefono uzante E-n. Kaj aŭtune 1933 sekvis nova sukceso: la poŝta administracio aperigis serion da poŝtkartoj ilustritaj, kies lingvo estis krom la portugala E. Pro la bona akcepto de la eldonaĵoj la poŝta direkcio aperigis komence de 1934 novan serion da tiaj poŝtkartoj. La unua serio konsistas el 20, la dua el 39 diversaj pecoj.

Kunlaboris ankaŭ al tiu ĉi sukceso Couto Fernandes, prez. de BLE depost 1910, la granda kuraĝiganto, kies entuziasmo ne malpliigis kun paso de la tempo.

C. DOMINGUES.

Bremón Masgrau Jacint, kataluno, kuracisto-radiologo, red. de kuracista revuo. Nask. 28 jan. 1885 en Banyoles. Fervora pioniro depost 1903. Kunfond. de pluraj societoj, komitatano de la 5a UK. Aŭtoro de multaj prop. artikoloj, de vortaro kaj gramatiko. Red. de *Tutmonda Espero*, 1909, prez. de *Espero Kataluna*, kaj de *KEF*. Verk. oĝ: E-gramatiko, (vendita en pli ol 60.000 e-roj; ŝlosilo; kelkaj tradukoj kolektitaj sub titolo *Hejma Prozo*. L. K.

Breon (breon) Edouard, franco, oficisto. Nask. 1853, mortis 5 feb. 1933

en Blois. E-ĝis 1901. Sekr. de SPPE de 1902, plenumis premeĝan laboron kun senlima sindonemo. Sekvis de Beaufront idistan, 1908, kaj rikoltis nur maldolĉan elreĝigon.

Breslau Boris M., sovetiano, hebreo, ĵurnalisto-redaktoro. Nask. 1891. E-isto depost 1909. En 1918 aperigis ruslingvan broŝuron *Lingvo int. kaj proletaro*. De post 1923 membro de CK SEU, en 1930 kaj 1933 red. de la ruslingva SEU-revuo *Aŭtoro de diversaj artikoloj pri E kaj felietonoj* (»Amerikanino« k. a.). En 1934 aperis ruslingva broŝuro de li: *E-Sensencaĵo?*

Bricard (brikar) Raoul, franco, prof. ĉe la Konservatorio de Artoj kaj Metioj: matematikisto. Nask. 23 marto 1870. Eksprez. de la Pariza EG. Kunorganizinto de la UK 1914 en Paris. Kunlaboris al *Scienca Revuo k. a. Verkis: Matematika Terminaro kaj Krestomatiko*, 1905. Trad. de Huntington: *La Kontinuo* (v.), 1907. LK., 1909.

Briegleb (brigleb) Karl, germano, d-ro fil., kuracisto en Worms. Nask. jan. 1859 en Alsheim. Volapükisto depost 1886, post studado de la »malgranda Borel« fariĝis E-isto. Vizitis kongresojn de GEA (Gotha ktp.). Agadis multe por E en kontraŭalkoholaj societoj. Prez. de la loka EG.

Briggs Charles Harold, usonano, analiza kemiisto. Nask. 1878 en Avon (New York). Specialisto kaj verkisto pri la cereala kemio. E-ĝis en 1907. Organiza kaj instruisturkurso en Minneapolis (Minnesota). Fondis grupon tie en 1908 kaj en Saint Paul dum 1925. Estis vicprez. de tiu lasta kaj konsilanto de EANA.

Briggs Louise, anglino, instruistino. Instruas ankaŭ E-n en sia (privata) knabinlernejo. Ŝi verkis multe da ĉarmaj teatraĵetoj por infanoj, kun vera kompreno de infana psikologio. Aparte eliris: *Cindrulino kaj aliaj teatraĵetoj*, 1920; *Sonĝo de someromeza nokto*, trad. de Shakespeare, 1921. Kunlaboris al *Literaturo*, kaj LM.

Britujo. La angla lingvo estas unu el la plej disvastigitaj, kaj en Britujo,

krom en partoj de Kimrujo kaj Norda Skotlando, ĝi estas ĉie parolata. La bezono je int. lingvo ne estas tiel multe sentata en Britujo kaj en la Brita Imperio, kiel ekz. en multaj partoj de Eŭropo, kie la lingva diverseco estas pli evidenta. La brito havas reputacion ne esti bona parolanto de alilandaj lingvoj, spite la fakton, ke klasikaj kaj modernaj lingvoj estas bone instruataj en ĉiuj lernejoj. Tamen en tiu ne promesplena kampo E forte enradikiĝis. Ĝia fortika kaj solida stato en B. estas rezulto de persista klopodado de kelkaj pioniroj, kies organizemo, ordemo, sindediĉo kaj entuziasmo kunmetis por ĝi firman fundamenton.

Kvar monatojn post la apero de la »Unua Libro« de Z (jul. 1887) artikolo en la Londona ĵurnalo »St. James's Gazette« pri lingvo nomata »Internacional« inventaĵo de d-ro E altiris la atenton de juna irlandano, studento de lingvistiko en la Universitato de Oxford, Richard H. Geoghegan, kiu havigis al si la lernolibron por germanoj, (N-ron 4 el la »Biblioteko«). Lerninte la novan lingvon, li tradukis ĝin por anglolingvanoj, kaj ĝi poste aperis kun la titolo »D-r E-s Int. Language Introduction and Complete Grammar, English Edition, by R. H. Geoghegan, 1889«. Poste li tradukis anglen la lernolibron de Trompeter kaj aliajn verkojn.

Sed estis en la Jorkŝira urbo Kighley, kie E atingis sian unuan grandan sukceson. Tie Joseph Rhodes, loka ĵurnalisto, faris en la komerca ĉambro la unuan prop. paroladon pri E en Anglujo kaj en nov. 1902 kun John Ellis, starigis la unuan E Societon en Granda Britujo. Li fariĝis prez., kaj Rhodes sekr. En la sama monato en la domo de d-ro O'Connor en London, kunvenis por studi la novan lingvon malgranda grupo, en kiu troviĝis krom O'Connor, f-ino E. A. Lawrence, kaj junulo nomita H. Bolingbroke Mudie, kies postaj servoj por la E movado estis nekalkuleble valoraj. Tiu grupo estis la nukleo de la Londona E Klubo, kiu starigis en jan. 1903, kaj fariĝis unu

el la plej potencaj grupoj ĝis hodiaŭ. Ĝi naskiĝis en la oficejo de la int. konata ĵurnalisto W. T. Stead, ĉefredaktoro de la »Review of Reviews«, kiu mem alportis al la lingvo ne nur sian fortan apogon, sed dediĉis financajn rimedojn kaj avantaĝojn de sia eldonista organizaĵo por ĝia diskonigo. Felix Moscheles, fama pentristo, fariĝis prez., Lawrence sekr. kaj Stead kasisto.

Sed la plej granda inspiro de la klubo kaj fine de la tuta movado en B estis Mudie, tiam juna borsisto. Rapide li kolektis ĉirkaŭ si aron da rimarkindaj homoj, kiuj kontribuis, ĉiu laŭ siaj apartaj talentoj, brilan helpon. Inter ili estis d-ro Pollen, antaŭa hinduja juĝisto, Maj-Gen. Cox, Motteau, Millidge, Wackrill, Ledger, Merrick, f-inoj Schafer kaj O'Brien. Preskaŭ ĉiu rekruto laboradis arde per parolo kaj plumo. O'Connor, Pollen, Mudie kaj aliaj faris prop. paroladojn tra la tuta lando; Motteau tradukis »The Tempest« de Shakespeare kaj kompilis la unuan E-A Vortaron. O'Connor eldonis novan lernolibron kaj, en kunlaborado kun C. F. Hayes, A-E Vortaron. H. F. Höveler (Ĉefeĉ) komencis eldoni la malkarajn »ŝlosilojn« por diversaj lingvoj.

En nov. 1903 aperis The E-ist, la unua brita E gazeto, kies red. estis la agema Mudie. Sur la kovrilo de la unua kajero aperis informoj pri grupoj en Bournemouth, Dublin, Edinburgh, Glasgow, Portsmouth kaj London. Rapide la movado disvastiĝis en ĉiuj partoj de la lando. En okt. 1904, por kontentigi la sentatan bezonon por forta centro de ĉiuj britaj grupoj, la »British E Association« (BEA) fondiĝis je la iniciato de la Londona Klubo. Al BEA filiigis grupoj ankaŭ el la malproksimaj partoj de la Brita Imperio, kaj aliĝis individuaj membroj pagantaj jarkotizon po kvin ŝilingoj. Ĝi dungis oficistojn, starigis bibliotekon kaj librovendejon, organizis ekzamenojn kaj eldonis monatan gazeton The British E-ist, al kiu The E-ist cedis lokon.

Dum ĝia tuta ekzistado »The BE-ist« estis gvidata de sinsekvo de bril-

aj redaktoroj, kiuj atingis kaj konservis por ĝi altan nivelon kiel modesta nacia gazeto, kaj gajnis por ĝi la respekton de E-istoj tra la tuta mondo. En 1924 aperis gazeto *International Language* lerte redaktata unue de C. H. E d m o n d s poste de L. N. Newell. Ĝi estis ĉefe anglalingva kaj celis interesi neE-istojn pri la lingvo. Post ok jaroj ĝi fandiĝis kun »The B E-ist«. De 1919 ĝis 1925 trimonata gazeto »Literaturo« alportis multe da helpo al la studo de la lingvo.

Grava stadio en la organizo estis la starigo de Federacioj de regionaj grupoj, kiuj kunigis la samprovincajn grupojn E-istajn por komuna agado. Jam en 1908 fondiĝis Fed.-oj en Lancashire kaj Cheshire, Yorkshire, Nord-Oriento, London kaj Mezlando; kaj poste sekvis nacia federacio de Skotlando. (Preskaŭ ĉiu fed. nun eldonas propran bultenon.)

Sendube la disvastigado de la lingvo ricevis plej grandan akcelon per la tria UK, okazinta en C a m b r i d g e en 1907. Neniam antaŭe okazis en B. kongreso, en kiu homoj de diversaj gentoj kaj nacioj kunvenis kaj interkompreniĝis per helpa lingvo. La spektaklo mirigis la ĵurnalojn, en kiuj aperis artikoloj favoraj aŭ malfavoraj, kiuj vekis multe da intereso. Fama univ. prof. en Cambridge, d-ro J. E. B. Mayor, atentigis pri la pedagogia valoro de E kaj rekomendis, ke ĝi estu instruata al infanoj kiel unua lingvo post la gepatra lingvo. Aliaj edukistoj, precipe d-ro A. Scougal, ĉef-inspektoro de lernejoj en Skotlando, poste donis al la lingvo fortan aprobon. Novaj lernolibroj kaj tradukaĵoj aperis, grupoj starigis tra la tuta lando, kaj novaj federacioj. Kursoj komenciĝis en vesperaj lernejoj kun ŝtata subvencio.

Skotaj E-istoj jam havinte du naciajn kongresojn, invitis la britan E-istaron en la ĉefurbon Edinburgh en pentekosto 1908. Tiu kongreso allogis 600 E-istojn el diversaj partoj de la lando, kaj estis la unua el serio de britaj naciaj kongresoj, kiuj okazis preskaŭ ĉiujare laŭ jena ordo: Leeds 1909, Cheltenham 1910, Southport 1911, Portrush (Irlando)

1912, Eastbourne 1913, Sheffield 1914, Bath 1915, York 1916, Liverpool 1919, Birmingham 1920, Harrogate 1921, London 1922, Bournemouth 1923, Chester 1924, Leamington 1925, Huddersfield 1926, Cheltenham 1927, Newcastle 1928, Canterbury 1929, Nottingham 1930, Birmingham 1931, Southport 1932, Oxford 1933. Dum tiuj kongresoj okazis la jarkunvenoj de BEA. Ĉiujare de 1913 la Duko de Connaught, onklo de la reĝo, estis la protektanto; kutime partoprenis lokaj eminentuloj, kaj urbestro donis oficialan akcepton. En ĉiuj okazis publika Diservo en E, ofte en la ĉefa preĝejo de la urbo.

En 1916—17 okazis en Patricroft apud Manchester, la fama »E c c l e s - E k s p e r i m e n t o«, en kiu 200 infanoj en elementa lernejo regule ricevis instruon pri E sub kontrolo de loka Eduka Komitato kaj ŝtata inspektoro. Post tri monatoj la inspektoro konstatis, ke la studado de E efikis ĉe la lernantoj simile al la studado de klasikaj lingvoj. Oni do permesis daŭran instruadon de la lingvo al ĉiuj infanoj en la lernejo kiel parton de ĝia ordinara studprogramo. Aliaj lernejoj sekvis tiun ekzemplon, kaj en 1922 la Edukada Departemento en London oficiale raportis al la Ligo de Nacioj en Genève, ke E tiam estis instruata en 13 unuagradaj kaj 4 duagradaj lernejoj al 1103 lernantoj, kaj en 10 vesperaj lernejoj al 269 lernantoj. La instruado en lernejoj estis multe helpata de »E Mont-hly«, gazeto ĉefe por lernantoj, kiun eldonis BEA de 1913 ĝis 1919. — En 1933 E estas instruata al 635 infanoj en 13 unuagradaj lernejoj: en 10 el tiuj lernejoj oficiale, en la ceteraj kiel temo nedeviga aŭ post lerneja horo. La perspektivo en tiu ĉi kampo estas nuntempe pli hela, ol antaŭe; ĉefa malhelpo estas, ke ankoraŭ E ne estas oficiala temo por lerneja ekzameno.

En 1917 kelkaj komercistoj en London organizis gravan eksperimenton, en kiu elektitaj komercistoj en sep diversaj landoj, sen antaŭa scio de la lingvo, entreprenis ĝin lerni dum tri monatoj kun la celo pruvi, ĉu ili povus sukcesplene interkores-

pondi pri komercaj aferoj. Post la fino de tiu periodo ili publike atestis favoran rezulton. Tiu eksperimento altiris multe da atento, kaj diversaj komercaj ĉambroj deklaris favorajn rezoluciojn. La Komerca Ĉambro de London jam starigis ekzamenojn de E, en kiuj sufiĉe granda nombro da lernantoj prezentis sin. Nuntempe »The Royal Society of Arts« regule ekzamenas pri E. La Brita Asocio por la Akcelo de la Scienco, la plej grava scienca asocio en la tuta Brita Imperio, en 1921 starigis komisionon el eminentaj sciencistoj kaj edukistoj por esplori la temon de int. helpa lingvo. Tiu komisiono, konsiderinte pri la ebleco de la latina, la angla kaj artefaritaj lingvoj por la celo, en 1922 favore raportis por E.

La UK okazis en 1926 en Edinburgh, kaj allogis 900 samideanojn el 37 landoj. W. M. Page prezidis, kaj la sekr.-oj estis J. M. Warden kaj W. Harvey. Aparta, tre interesa trajto de la Somera Universitato estis fako de folkloro kaj popolokanto. Dum la kongresa Diservo en la katedralo de S-ta Giles, la Biblio en E estis solene dediĉata. Ĝia eldonado estis unu el la plej gravaj servoj, kiujn faris britaj E-istoj por la lingvo. — En 1930 la UK estis aranĝata denove en B, en la univ. urbo Oxford. Bernard Long estis prez. kaj prof. Collinson prezidis la Someran Universitaton.

En 1931 Collinson estis difinita kiel unua lektoro pri E en la universitato de Liverpool, kiu por tiu celo ricevis kapitalon de 4000 pundoj, testamente de d-ro John Buchanan. — En la knabskola movado E trovis multajn adeptojn. La brita iniciatinto Lord Baden-Powell rekomendis E-n kiel lingvon por la interpretista insigno, kaj multe da knaboj lernis la lingvon tiucele. Ankaŭ la int. societo Skolta E-ista Ligo fondiĝis en B. en 1918. —

La ĉefa organizaĵo estas la BEA, kies nuna prez. estas R. Robertson, kaj kiu havas sidejon en centra parto de la ĉefurbo. Tie laboras kun aliaj la sekretario M. C. Butler (de jun. 1916; antaŭaj sekretarioj: H.

F. Sexauer, majo 1905—jul. 1906; H. Clegg, aŭg. 1906—febr. 1915; E. A. Allsop, marto 1916—majo 1916), kaj la administranto C. C. Goldsmith H. De feb. 1934 ĝen. sekr. estas C. C. Goldsmith; (ne plu estas ofico »administranto«). M. C. Butler restas sekr. eduka, ekzamena, propaganda. BEA nun havas 1870 individuajn membrojn kaj 98 grupojn, kiuj plejparte estas filiiĝitaj el 14 regionaj federacioj. La ĵara librovendo de la asocio valore sumiĝas al 2000 pundoj. BEA aranĝas ankaŭ ekzamenojn, kursojn per korespondo, oficialan organon »The B E-ist«, kaj konstantan propagandon tra la tuta lando, multe helpatan de la fakto, ke ĝi posedas propran aŭtomobilon. La biblioteko (v.) de la asocio estas tre grava kaj ampleksa, unu el la ĉefaj en la E-istz mondo. La funkciado de la asocio atingis altan gradon de efikeco, al kiu kontribuas konstanta malsubteno de donacantoj kaj garantiantoj.

Britujo estas centro de diversaj religiaj societoj. La Angla Ligo de Katolikaj E-istoj estis fondata en 1912, restarigita en 1926, stato 83 anoj, prez. R. A. Davies, sekr.-kas. J. E. Hookham. Kvakera E-ista Societo fondiĝis en 1921, stato 127 membroj, prez. C. R. Buxton, sekr. Mabel Harrod. Jam de 22 jaroj seninterrompe okazas en London ĉiunmonate nesekta Diservo en E.

La angla literaturo estas inde reprezentata en la traduka literaturo de E. Krom la jam aludita »La Ventego«, troviĝas el la teatraĵoj de Shakespeare ankaŭ »Julio Cezaro« kaj »Makbeto«, tradukitaj de Lambert, »Venecia Komercesto« de Wackrill, »Sonĝo de Someromeza Nokto« de L. Briggs, kaj »Reĝo Lear« de pastroj Ashley kaj Curry. Estas menciindaj ankaŭ la tradukaĵoj: »Luno de Izrael« de Rider Haggard (trad. M. C. Butler kaj E. S. Pyson), »La Dormanto Vekiĝas« de H. G. Wells (A. F. Millward), »Ok Noveloj« de Bennett (A. E. Wackrill.)

La aparta laborista E movado en B. estas malforta, la B Laborista

E Asocio havas 10 grupojn kaj 160 anojn.

Noto. La artikolon trelegis kaj kompletigis M. C. Butler kaj B. Long. W. M. PAGE.

Lernejoj. Ĉe la 24-a Kongreso de BEA en Oxford okazis 15 apr. 1933 kunveno por instruistoj kaj aliaj interesitaj pri edukado. Ĉeestis proks. 70 p. Prelegis M. C. Butler. Li unue pritraktis la pretendojn de E kiel lerneja temo, poste plej oportunan aĝon por ĝia enkonduko. Li proponis la lastan jaron de la Unuagrada Popolternejo, aŭ la unuan jaron de la Liceo, sed opiniis, ke nuntempe ĝia plej bona ŝanco troviĝas ĉe la Daŭriga Popolternejo. Poste li resumis la respondojn ricevitaĵojn al demando sendita al lernejoj.

E nun estas instruata, aŭ oficiale aŭ neoficiale, en 27 lernejoj en Anglujo; pri lernejoj en Kimrujo, Skotlando kaj Irlando mankas informo. El la 27 lernejoj 14 estas popolternejoj, en kiuj oni instruas la lingvon oficiale en 8, neoficiale en 6, al 655 gelnantoj entute (454 knaboj kaj 201 knabinoj). En la ceteraj 13 liceoj aŭ aliaspecaj dua- aŭ alt-gradaj lernejoj, 5 havas oficialan, kaj 8 neoficialan instruon; entute 351 gelnantoj (161 knaboj, 190 knabinoj). La sumo da gelnantoj do estas nuntempe 1006; 733 estas instruataj devige, 273 neoficiale. Lernolibroj uzataj: »Step by Step« en 8 lernejoj; »Tra la Jaro« 4; »Concise Course« 3; aliaj 4, neniam 8. Legolibroj: »E por Infanoj« 4, »Cindrulin« 2; 25 aliaj lernejoj ricevis specimen lecionon.

Butler forte substrekis la mankon de sufiĉe da vere konvenaj legolibroj por infanoj; ankaŭ esprimis sian konvinkon, ke E ne atingos firman lokon en la temaro de lernejoj, ĝis la lingvo troviĝos oficiale en la temaro por la abiturienta diplomo.

F-ino Edwards (Bishop Auckland) diris, ke la ĉefa malhelpo kontraŭ la progreso de E en la lernejoj estas la manko de modernlingvaj instruistoj, kiuj scias E-n. Ŝia oficiala instruado okazas ĉe Grado I (11-jaraj lernantinoj), prepare al la franca

lingvo. Ŝi rakontis pri la granda sukceso de la Ĉe-metodo en sia propra sperto, ankaŭ substrekis la gravecon provizi al la lernantoj okazojn daŭrigi la studadon de la lingvo post lerneja jaro, ekz. per loka grupo. Kroma esencaĵo estas eviti, ke la instruado de E dependu de la entuziasmo de unu persono. Parkin (Sibford) informis, ke li havas ses kolegojn, kiuj povas instrui la lingvon, sed ke la okazoj estas limigitaj pro tio, ke E ne estas, kiel la franca, deviga temo por la abiturienta diplomo. Goodes (Romford) rakontis malfacilaĵojn ĉe reorganizo de klasoj. Ekz., unu klaso, jam komencinte la studon de E, dividigis, kaj la du partoj estas kunigitaj kun aliaj infanoj ankoraŭ ne lernintaj la lingvon. Ĉe lia lernejo ses kolegoj lernas E-n. F-ino Nixon (Bournville) parolis pri la malhelpo, kiu okazas, kiam la lernantinoj havas multe malsimilan menspovon, kiel ĉe Daŭriga Lernejo, en kiu la tipoj similas tiujn de la Vespera Lernejo. Ŝi ankaŭ substrekis la mankon de taŭga legmaterialo por komencantoj. Tussell, Scott (Letchworth) emfazis la amatoran kvaliton de la instruado pri E, kaj la bezonon por instruistoj laŭcele preparitaj. F-ino Fortey (Croydon) opiniis, ke estus domaĝe senkuragi tiujn, kiuj instruas la lingvon eĉ post mallonga sperto kaj kun malgranda scio. Kelkfoje mankas aliaj instruistoj, kaj oni tamen povus atingi bonajn rezultojn. Laŭ B. E-ist.

Laborista movado en Bneniam estis forta. En 1920 restarigis Brita Ligo de E-istaj Socialistoj, sed havis nur ĉ. 30 membrojn. BLES eldonis flugfoliojn, broŝuron kaj iom post iom akiris kelkan influon ĉe laboristaj organizoj. Grava kleriga revuo »Plebs« enpresigis regule notojn pri aŭ el E. La Nacia Konsilantaro de Laboristaj Kolegioj (marksista kleriga organizo) akceptis E-n en siaj kursoj kaj eldonis tradukon anglan de »La Lab. E-ismo« de Lanti. Diversaj ĉefoj el la laborista movado subskribis alvokon favoran al E (1925). En 1927 BLES alinomiĝis B Laborista E-Asocio. En 1932 BLEA transiris al IPE. La SAT-anoj formas

apartan organizaĵojn SATEB (-SAT En Britujo). Adreso: H. Spiller, 13 Dewsbury Rd, London, N. W. 10.

G. P. de BRUIN.

Briquet (brike) Maurice, franco, kuracisto-radiologo. Nask. 9 aŭg. 1865 en Lille. Kunlaboris al Int. Med. Revuo kaj direktis ĝin kun d-ro Vanverts. Redaktis la bulleton TEKA. Verkis: E-a Teknika Medicina Vortaro, 1933.

Brouwer (braŭer) Petrus Mischeel, nederlandano, ĉefinstr. Nask. 27 apr. 1897 en Stompwijk apud Hago. Ekleris E-n en 1929 por konvinki la E-istojn, ke E ne estas vivanta lingvo, sed baldaŭ konvinkigis pri la malo, kaj farigis fervora E-isto. En 1930 prez. de la sekcio de N. K. en Hago Red. de la liga gazeto de N. K.

Brown Wm, B. Sc., irlandano, prof. Kuntradukinto de la verko Pri la origino de P homo de A. Keith.

Browne (braŭn), Giles Leigh, anglo. Nask. en London, 26 jul. 1883, mortis 21 feb. 1919. E-istiĝis en 1903. La unuan tagon de lernado faris publikan paroladon en E. La unua E-instruisto sub la »London County Council.« Klera lingvisto kaj poeto: trad. E-en el multaj lingvoj. Dum la milito unu el la registaraj cenzuristoj por E. Sciis 24 lingvojn; sur lia leterpapiro ili aperis en trikolumna listoj, kaj sube: »Skribu en Esperanto«.

Bruijn (bröjn), Jacob Leendert, nederlandano, librotenisto. Nask. 24 nov. 1880 en Haarlemmermeer. E-isto de 1896. Pioniro de la laborista E-movado. Red. de Int. Soci. Revuo 1910—11, Holanda Picaro 1912—13. Direktoro de la Ĝenerala Librejo »Espero« 1911—14 kaj de la Centra E-librejo 1914—22. Membro de la Gazetar-klubo. Iniciatinto de Nederland-E kaj ĝia red. en 1918—19. Sekr. kas. de la 12-a UK.

Bruin (bröjn) Gerrit Paulus de, nederlandano, kontoristo. Nask. 3 okt. 1895 en Rotterdam. Fabriklaboristo de la 12-a ĝis 21-a jara aĝo. Lernis E-n en 1912—13. Publikigis artikolojn speciale en laboristaj gazetoj. Kompilis Historion de la laborista E-movado ĝis 1914

(La Nova Epoko, 1931). Aŭtoro de Gvidilo tra la E-movado, 1933 kaj de N-lingva prop. broŝuro. Propagandis por SAT en Nederlando de 1922. Gvidis la Nederlandan Laboristan E-Servon 1922—25. Sekr. kas. de Laborista Ekzamena Komitato. Kunlaboris al SAT-eldonaĵoj. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Brunet (brüne) Charles Jean, (ps. Nazumulo; Li; ŝiŝinet), franco, meĥanikisto pri stebiloj, prez. de la Filio Jironda de Paŭto-motor-ciklo-reparistoj en Francujo. Nask. 5 jun. 1875 en Bordeaux, Ano-fondinto de la EG en B. (okt. 1902) kaj kas. de 1905. Dumviva ano de SFPE kaj UEA, del. de UEA seninterrompe de 1908. Faris gravajn servojn helpe de E per la serĉo de vunditaj kaj malaperintaj soldatoj dum la milito. Gvidis kursojn ankaŭ per radio (»Soud-Ouest«). Verkis amuzajn (ŝaradoj, enigmoj ktp.) por La E-iste; Tra la Mondo, Tra la Filatelio ktp. Versaĵoj en La Revuo, kanzonoj, kiuj estis kantataj dum grupaj festoj, aperis en La Vagabondo.

Bruxelles. Ĉefurbo de Belgujo; 833.000 loĝantoj (kun antaŭurboj). Mondpalaco kun E-sekcio. 4-a SAT-kongreso 14—18 aŭg. 1924; ĉ. 90 partoprenantoj el 14 landoj. Honorprez. E. Toller. Malpliseverigo de la kondiĉoj pri membreco. Rekomendo uzi en SAT-eldonaĵoj simplan stilon.

BRUIN.

Brzostowski (bjostovski) Aleksandro, polo, ĵurnalisto, bibliotekisto. Nask. 1848 en Ostrog, mortis 1920 en Warszawa. Kun E li konatiĝis en 1887 kaj konsideris sin unua E-isto en Polujo. Unua prop-isto de E en sia lando. Aktiva organizanto. Aranĝis en 1909 faman E-ekspozicion en Czenstochowa kaj ankaŭ en Warszawa en 1910. Dum sia tuta vivo li celis fondi E-an muzeon en W. Eldonis diversajn foliojn kaj broŝurojn pri E, liaj artikoloj pri E atingas 200.

Bubalo Niko, kroato, financa konsilanto. Mortis en 1924. Estis kunfond. kaj sekr. de antaŭmilita ES en Sarajevo. Kroatigis poemojn de Z kaj E-igis popolajn poemojn, eldonis bukedon de kroataj versaĵoj

kaj plenan E-K kaj K-E Vortarojn; bona vortaristo; gvidis kursojn en Mostar.

Buchanan (bukanan) George Douglas, skoto, komercisto. Nask. 23 jul. 1874 en Glasgow. Vicprez. de Brita Astronomia Asocio; konsilanto de Reĝa Filozofia Societo; ambau en Glasgow. Prezidinto kaj nun hon. prez. de Glasgow-a ES. Vicprez. de BEA. Del. de UEA 1910—25. Verkis multajn prop. artikolojn.

Buchanan (Bukanan) John, skoto, kuracisto. Nask. 1859 (?) en Paisley, mortis 27 febr. 1930 en London. Vicprez. de TEKA. Inter la unuaj membroj de BEA. Testamentis 4000 anglajn pundojn al la Universitato de Liverpool por starigi tie E-an lektoran postenon.

Budapest. Ĉefurbo de Hungarujo sur ambaŭ bordoj de la Danubo; 961.000 loĝantoj. (Granda-B. 1,262.000 l.) Int. E Katolikaj Kongresoj, la 3-a en 1912 kaj la 15-a en 1930 okaze de la festoj de Sankta Emmeriko. 1—8 aŭg. 1929 21-a UK; 1256 kongresanoj el 33 landoj; temoj: elparolado, radio-propagando, tradukado en kongresoj. — Eldonejo de »Literatura Mondo« kaj AELA; loĝloko de Baghy kaj Kalocsay. B. estas rigardata kiel grava spirita centro nuntempa de E.

Budhismo. Religio de almenaŭ kvinono de la loĝantaro de la tero, sur doktrinoj de paco kaj pacamo, racia pravigo de altruismo. E-grupo ĉe la Ootani B-a Univ. en Kioto de feb. 1922 ĝis marto 1926 eldonis gazeton La Paco, red. de Kozo Tanijama. En 1925 A. C. March el London kaj Edgar Grot el Riga klopodis por fondi Int. Ligon de budhanaj E-istoj, kaj proks. samtempe fondiĝis »Budhana Rondo«, sed nek unu, nek la alia atingis vere int. vivon. Nur en la gazeto »Buddhism in England« aperadis E fako de tiam ĝis 1930. En jan. 1930 Budhana Ligo E-ista ekagadis, elsendante bulletinon La B., kiu poste fariĝis kvaronjara organo. Samjare japanoj sekvis per fondo de Japana Budhana Ligo E-ista. BLE havas centron ĉe Geo. H. Yoxon, 8 Elmwood Drive, Hes-

wall (Cheshire), Anglujo, kaj JBLE ĉe Takakura-kaikan, Rokujo-Takakura, Kioto, Japanlando. Vasta agado kuŝas antaŭ la liganoj: la traduko de la ampleksa b-a »biblio« (Tripitako) de kanonaj skribaĵoj, la enkonduko de E en budhanaj landoj, ĉefe prede de la misiistaj organizaĵoj kaj la konigo de la doktrinoj de B. al la E-istoj de la okcidento.

Geo H. YOxon.

Bugge Paulsen, Rolf, norvego, antaŭe diversaj profesioj, nun kapitano de infanterio, Oslo. Nask. 11 dec. 1894 en Bergen. Ano de pedagogiaj kaj humanismaj asocioj; artikoloj por revuoj kaj gazetoj; pluraj vojaĝoj eksterlande. E-isto de 1907. Prez. de NEL 1919. Ano de ekzamena komisiono de NEL depost 1923, L. K. 1932; ktp. Restarigis »N E-isto-n« en 1922 kaj 1932. Vizitis kvar UK kiel reprezentanto de la norvega registaro. Faris multajn prop. paroladojn diversloke, faris depost 1925 ĉ. 25 radioparoladojn kaj gvidis vintre 1928—29 la unuan radiokurson de E en N. Gvidis multajn kursojn i. a. 7 kursojn en Svedlando invitita de SEI. 1931—32 gvidis 4 Cseh-kursojn por policanoj en Oslo, fondiĝis klubon inter policistoj. Preparis la kurson de A. Cseh ĉe la Universitato en Oslo, 1930. Verkis aŭ eldonigis propagandilojn kaj lernolibrojn.

Buhr (bur) František, ĉeĥo, kalkula oficisto en Praha. Nask. 30 aŭg. 1896 en P. E-isto de 1922. Propagandas inter katolikoj kaj skoltoj. Sekr. de la Ligo de Katolikaj E-istoj. Eld.: Kalendaro, 1922.

Bujwid Odo, polo, d-ro, univ. prof. en Krakovo de 1892. Nask. 30 nov. 1857 en Wilno. 4 jarojn studis en la universitato kun Z. Studis la bakteriologion ĉe Koch kaj Pasteur. De tiu am int. konata eminentulo sur tiu kampo. El lia plumo eliris 250 sciencaj artikoloj en pola, franca, germana kaj rusa lingvoj. Kune kun sia edzino li organizis multajn prelegojn kaj kursojn pri populara klerigado kaj propagando de higieno kaj sociaj sciencoj. La du urboj, Varsovio kaj Krakovo, kie li ofte laboradis samtempe, antaŭmilite apartenis al di-

versaj landoj, al Ruslando kaj Aŭstrujo. Post la milito li — kolonelo demobilizita — revenis Krakovon kaj okupiĝas ĝis nun pri fabrikado de vakcinoj. Lia agado por E komenciĝis en 1912, kiam li fariĝis la prez. de UK en Krakovo. Postmilito prez. de la Tutpola Federacio de E Societoj. Li havante gravajn rilatojn kaj konatecojn en la regantaj polaj medioj, ofte atingis favorojn por E kaj E-istoj (pasportoj, vizoj k. a.). Dank' al liaj pledoj la respublika prez. kaj Pilsudski mem fariĝis favoraj al E: akceptis la patronecon de la UK en 1931, kies prez. estis li mem. Ankaŭ lia merito estas, ke la pola radio de tempo al tempo aranĝas E-ajn prelegojn. En 1924 fondiĝis en Krakovo la PED, kaj li fariĝis ĝia prez. En 1927/28 vojaĝis kiel delegito de sia registaro al Brazilo, por studi la vivon de tieaj polaj koloniistoj. Multe helpis lin en la komisiio E-istoj, kion li raportis al la registaro. En 1930 prop. vojaĝo tra Nederlando, Danujo kaj Svedujo. L. K., prez. de ISAE, honora ano de UEA, ktp. Multaj artikoloj kaj paroladoj en kaj pri E. De kelkaj jaroj li eldonas proprakoste la P E-iston kaj ĉiujn publikigaĵojn de PED. Ankaŭ aliaj gravaj materialaj subtenoj por E. Entute: la ĉefulo de la E movado en Polujo, lia aŭtoritato ĉe la polaj E-istoj estas senescepta. — Lia edzino, Kazimiera B., pioniro por la virinaj rajtoj, estis fidela helpantino ankaŭ en E-aj laboroj; ŝi mortis 8 okt. 1932.

E. WIESENFELD.

Buk Vilim, presisto en Slav. Brod (Jugosl.). Kunfondinto de La Suda Stelo kaj kuneldonanto de E libroj.

Bulgara Antologio. Kunmetis I. H. Krestanov, kunlaboris Atanasov, Jordanov, Dobrev, Ĝuĝev, Grekov, Stajkov kaj Sirakov; la piej grandan parton de la poemoj trad. Kalocsay. 40 aŭtoroj. 1925, 248 p. »La bone efektitaj rakontoj kaj lerte tradukitaj poemoj gvidas la leganton en la romantike ĉarma lando de bulgaroj. La libro aperigas antaŭ ni la historion kaj vivon de la popolo kun siaj suferoj, noblaj aspiroj kaj nedetruibla fido al pli bela estonteco.« (Jobo, LM 1925, p: 116.)

Bulgara Esperantisto. Organo de BEA, fondita en 1919; formato 24,5x16 cm. Redaktis A. Grigorov kaj Z. Zahariev. Nuna red. Simeon St. Hespâiev.

Bulgara Lando kaj Popolo. Verkis J. H. Krestanov. 1919, 128 p., kun etnografia karto. Enhavo: geografia, kaj historia superrigardo, popola karaktero, lingvo kaj literaturo, E-movado en B-ujo.

Bulgarujo. Juĝa ŝtato, kun popolo malfruiĝinta en la kultura progreso, kalkulanta tre limigitan kvanton da personoj, kiuj posedus fremdajn lingvojn, prezentas bonan grundon por la E-movado.

Jam en 1888 troviĝis apartaj E-istoj, lernintaj la lingvon per rusaj lernolibroj. Tion favoris la proksimeco inter la lingvoj rusa kaj bulgara, kaj ankaŭ la populareco de la rusa literaturo. Unua lernolibro por bulgaroj aperis en 1889, verkita de Miloslav Bogdanov, kiu prezentis sin antaŭ la publiko kun E-igita nomo: D-ro Favorogloro Diodono, kio longe liveris materialon al la bulgaraj humoristoj. Kelkaj personoj, lernintaj E-n, aliĝis al Bogdanov kaj li formis jam en 1889 »Societon de la amikoj de tutmonda lingvo,« en Sofia, je kies nomo li komencis eldoni monatan gazeton Mondlingvisto, la dua E gazeto laŭtempe en la mondo. (Aperis nur du aŭ tri n-roj). Baldaŭ la societo mortis: la anojn forpelis la malbona famo pri la lingvo, kaŭzita per la konduito de Bogdanov.

Ĉirkaŭ 1897 komencis vigan propagandon Friso Popov, kiu eldonis lernolibron, verkis artikolojn en ĵurnaloj kaj revuoj, faris paroladojn. Al li helpe venis la entreprenema Georgi Oreškov. En 1898 jam estis sufiĉa kvanto da unuopaj E-istoj. Fine de la sama jaro en Tirnovo fondiĝis loka grupo »Lumo« kaj en 1900 en Plovdiv klubo »Stelos«, kiu faris efikan propagandon, eldonis lernilojn, aperigis monatan ilustritan gazeton Rondiranto, kiu daŭris tri jarojn kaj duonon (febr. 1902— aŭg. 1904).

Ĉirkaŭ 1904 en la ĉefurbo fondiĝis loka societo »Aŭroro«, sub gvido de

Nikola Kovačev, Petr Popov, Georgi Aktarĝiev k. a. En 1904 aperis en Ruse la gazeto *Trumpetisto de Hristo Rjajovski* (marto—sept.) — En 1905 en Sofia rondo de universitataj studentoj (Rjajovski, Simeon Petkov, Georgi P. Genov — nun univ. prof. de juro, — Georgi Nikolov, Petr Spasov, Georgi Zografski, Georgi Karastojanov k. a.) komencis seriozan laboron kun granda sukceso. Komence ili eldonis litografe tre bonan gazeton *Unua Paŝo* (jan.—dec. 1906).

En 1906 la E-istoj el Sofia kunvokis la unuan E bulgaran kongreson en la ĉefurbo. (La sekvintaj kongresoj okazis en: 1907 Tirnovo, 1908 Ŝumen, 1909 Ruse, 1910, 1919, 1920, 1921, 1922 Sofia, 1923 Tirnovo, 1924 Ruse, 1925 Sofia, 1926 Varna, 1927 du kongresoj: eksterordinara en Sofia kaj ordinara en Plovdiv, 1928 Vraca, 1929 Vidin, 1930 Sofia, 1931 Stara Zagora, 1932 Sofia. Antaŭ la unua kongreso okazis en Tirnovo 1905 interkonatiĝa antaŭkongreso, kiun ĉeestis 25 personoj.) Rezulte de la kongreso fondiĝis »B Societo por propagando de E«, kiu en 1907 ekeldonis dumonatan gazeton *B E-isto*, bone redaktatan, sed de ĝi aperis nur tri n-roj (jan.—jun.). La societo ne daŭris longe. Same la rondo de ĝiaj iniciatintoj disiĝis.

Inter la gvidantoj de la movado en Sofia kaj la grupo »Lumo« en Tirnovo ekestis antagonismo: la sofianoj prefere atentis la sciencan flankon de la afero, la tirnovanoj emis al brua amasa movado, kaj en 1907 ili eldonis propran gazeton *Lumo* (okt. 1906—jun. 1910). Inter tiu gazeto kaj »B E-isto« estis rivaleco. Post kiam ĉesis vivi la Soc. por propagando de E, la tirnova grupo kunvokis en sian urbon novan kongreson, kiu metis la fundamenton de la B E-ista Ligo. (La centro de la Ligo alterne lokigis en: Tirnovo 1907—1908, Ŝumen 1908—1910, Sofia 1910—1928, Ruse 1928—1930, Sofia 1930—).

En 1911 aperis personaj malkonkordoj en la movado: la agantoj en la ĉefurbo montris tre severan kritikemon al kelkaj ĝistiamaj gvidantoj en la provinco. Tio malfortigis la or-

ganizajon. Aliparte en la sama jaro la sekr.-kas. de BEL, Teodor Kanev fariĝis idisto kaj per cirkulero invitis la bulgaran E-istanon sekvi lian ekzemplon. Tio konfuzis ankoraŭ pli multe la movadon.

En la kongreso de 1910 (Sofia), kiun ĉeestis multaj rumanaj s-anoj, oni decidis unuigi la du naciajn E gazetojn »Lumo« kaj »Rumana E-isto«; kreiĝis komuna gazeto, *Danubo*, red. de miksitaj dunacia komitato kaj presata en Bucuresti. (okt. 1910—jul. 1912). Malĉev D. eldonadis en 1911 monatan *Semo dulingve*, poste ĉiusemajnan gazeton *Kulturo kaj «ĉiutagan» Telegramo*. Jam en 1908 la kongreson en Ŝumen partoprenis s-anoj el la najbara Rumanujo. Similaj reciprokaj vizitoj okazis plue en 1909 Bucuresti, 1910 kaj 1911 Sofia, 1912 Ruse, 1922 Cluj, 1923 Tirnovo kaj Timiŝoara, 1924 Arad. Krome la bulgarajn kongresojn en 1922 kaj 1930 partoprenis s-anoj el Jugoslavujo kaj tiun en 1932 s-anoj el Rumanujo. Notinda estas la agado de la rusa E-isto Evstifejev Nikolaj, kiu en 1908—10 loĝis en Sofia.

En 1912 la BEL ŝanĝis sian nomon je B E-ista Societo, bazita sur centraliga tendenco, en 1926 BES nomiĝis B E-ista Asocio. Depost 1919 oficiala organo estas la B E-isto.

Ĉ. 1925—26 montriĝis en la organizado kaŝa interna batalo, kun politikaj tendencoj. Sekvo de tio estis financaj embarsoj, tre granda ŝuldo, organiza dekadenco. En 1927 la aferoj trudis kunvokon de eksterordinara kongreso, kiu havis la taskon solvi la internan krizon.

En la kongreso en 1930 okazis ankaŭ balkanlanda konferenco, partoprenita de E-istoj el Bulgarujo, Jugoslavujo, Grekujo kaj Rumanujo. Ĝi decidite komenci komunan balkanan E revuon *Balkana Konkordo*; ĝi aperadis nur de jan. ĝis jul. 1931 (7 n-roj).

Depost 1928 la proletaj E-istoj apartiĝis en specialan landan organizajon »Laborista E Asocio en B«, kun presorgano unue *Balkana Laboristo*, poste »Mejdunaroden Ezik« (Int. Lingvo). Eldonis prop.

broŝurojn kaj E—B kaj B—E vortarojn, verkitaĵn de Grigorov Asen. La organizaĵo estas sufiĉe forta kaj agema.

Idista Movado aperis en 1922—23 tre malforte; fondiĝis grupoj en Plovdiv kaj Kjustendil, dum 1½ jaroj oni eldonis gazeton »Oriental-Idisto«. Baldaŭ la movado plene estingiĝis. En 1926 okazis en Sofia diskuto en du sinsekvaj publikaj kunvenoj inter Krstjo Misirkov kaj Atanas D. Atanasov. pri Ido kaj E.

Oficialaj sukcesoj estis sperteblaj ĉefe sur la instrua kampo. En 1912 la ministerio de instruado per speciala cirkulero rekomendis al ĉiuj lernejoj de la lando la tiam aperintan Lernolibron de E de Krestanov, (kiu en 1908 fondis »Bulgara E. Biblioteko«). Samjare oni instruis E-n en Dupnica kiel laŭvolan lernobjekton kun oficiala aprobo. En 1920 la ministro de la popola instruado rekomendis la lingvon al la atento de la direktoroj de la mezgradaj lernejoj (cirkulero N 37.923 de 20. XII), kaj sugestis, ke ili akcelu la gimnazianojn lerni la lingvon en la vesperaj kursoj. En 1921 la ministerio rekomendis al la lernejoj bibliotekoj la gazeton B E-isto (cirk. N 1870 de 27. I.) En 1921 per la leĝo pri la popola klerigo (artikolo 143) E estis oficiale enkondukita kiel nedeviga lernobjekto en la programon de la »realaj lernejoj« (geknaboj de aĝo 14—16 jaraĵ). La lingvo estis oficiale instruata de ŝtate pagataj lektoroj en ĉirkaŭ 30 lernejoj dum 1921/22, 1922/23, 1923/24 kaj parte dum 1924/25 lernjaroj. En 1925 la leĝo estis modifita, la »realaj lernejoj« kiel aparta lernejspeco forigitaj kaj sekve la instruado de E en ili nuligita.

En 1928 la ministro de instruado ordonis (per cirk. N 9607 de 10. IV) disformigon de ĉiuj gimnazianaj E grupoj kaj de ilia landa ligo; ankaŭ estis malpermesate al la lernantoj viziti la E kursojn kaj ricevi la gazetojn B E-isto kaj E-ista Gejunularo. Preteksto: E servas kiel kaŝilo de nepermesata propagando de politikaj ideoj inter la gimnazianoj kaj krome ĉar E estas facila lingvo,

la studentoj al kutimiĝis al la lernado de facila lernofako kaj pro tio ili ne havus energion lerni pli malfacilajn lernofakojn. BEA kontraŭagis per ekspozo, eldonita broŝure kaj disvastigata en la publiko. Sed jam en 1931 la ministro per nova cirkulero (N 42.402 de 21. XII) nuligis la antaŭan ordonon kaj restarigis la antaŭan favoran sintenadon de la ministerio. E estas oficiale instruata de ŝtate pagata lektoro en la sofia ŝtata blindulinstituto de post 1922 ĝis nun kaj al la poŝt- kaj telegraf-oficistoj en la vesperaj kursoj de fremdaj lingvoj, aranĝataj de la direkcio de PTT en Sofia dum 1929, 1930, 1932. Dum la lernjaroj 1931—32 kaj 1932—33 la komerca knabina gimnazio »Minerva« en Sofia enkondukis devige E-n en la lastaj 2 klasoj. E-n propagandis per paroladoj kaj artikoloj Krestanov, Atanasov, Pamporov kaj Hesapĉiev. — Interesa konstato: la movado signis fortan progreson en la jaroj 1900, de 1906 ĝis 1910, 1912, de 1921 ĝis 1925, kaj periodoj de la dekadenco estis: 1902—1905, 1911, 1913—1920, 1926.

Aldono. En 1931 la stato de BEA estas: 26 lokaj grupoj kun sume 500 membroj. Prez. G. Aktarĝiev. Apud la asocio estas fondita B E Instituto, kun celo organizi ekzamenojn, kontroli la E eldonaĵojn, direkti lingvajn studojn, kolekti materialojn pri la enlanda movado; bone iniciatita, sed malvigle aganta. BEA estas en periodo de malforteco, sekve de la organiza krizo de 1926—1927. La budĝeto de BEA en 1931—32 estis 20.000 levoj. La organo B E-isto aperas regule. En B. estas venditaj sume 70.000 lernolibroj kaj 12.000 vortaroj de E. Eĉ la pli gravaj lernolibroj, vortaroj kaj tradukaĵoj: Popov kaj Oreŝkov — Plena manokonduko por ellerno de la L. I. E, 1900; Krestanov — Vortaro de E (E—B kaj B—E kaj gramatiko) III-a eld. 1930; Atanasov — Kurso de E, VII-a eld. 1931. — Bulgara Antologio, (prozo kaj poezio), kompilis Krestanov, 1925. — Versaĵoj de Botjov, trad. Dobrev, 1928; Bulgaraj Rakontoj de Vazov, trad. Atanasov, 1928; Nuntempaj ra-

kontoj de Stamatov, trad. Krestanov, 1922.

Rimarko. La artikolon tralegis kaj kompletigis Krestanov.

A. D. ATANASOV.

Bullen George W., (ps. Franks), anglo. Mortis preskau 70-jara en Brita Kolumbio 24 dec. 1912. Unu el la sep fondintoj de BEA. Verkis tri lernolibrojn.

Bulonja Deklaracio, v. Deklaracio de Boulogne.

Bulteno de CK SEU. Gazeto por praktikaj problemoj de Sovetia E-movado, fondita en 1922; formato 31×22.5 cm. Red. N. Nekrasov.

Bulteno de ISAE kaj sekcio de teknikaj vortaroj. Red. Rollet de P'Isle. Aperas de 1926 en Paris; kvaronjara.

Bulthuis (bulthöjs) Hindrik Jan, nederlandano, doganoficisto de 1889 ĝis 1924, nun en pens. Nask. 15 sept. 1865 en Warfum, Groningen. En juneco li estis Volapükisto, en 1899 ricevis diplomon en V. kiel ĉefinstruisto. En 1901 D. Uitterdijk sendis al li lernolibron de E kaj post tiu tempo li estis E-isto. Multe korespondis kun alilandaj E-istoj, multe prop-is E-n, precipe en Haag, gvidis kursojn, funkcias kiel sekr. de ekzamena komitato de ĝia starigo ĝis nun. De 1910 L. K. En la lastaj jaroj li laboras nur por E. — Kiel originala romanisto, tradukanto kaj verkisto de pedagogiaj libretoj, B. estas unu el la plej persistaj laborantoj en la E-a kampo. Ekde 1907, kiam aperis lia Du Biletoj, trad. el la franca de Florian, li eldonigis 35 librojn kaj broŝurojn. Neniam estas pli bone ol malfrue, komedio trad. el la angla, ŝajne lia unua presita verkaĵo, aperis en la lit. aldono de „L. I.“ en 1905. Li tam-igis precipe pro trio de longaj originalaĵoj. Idoj de Orfeo, 1923, malgraŭ iuj nekredelaĵoj, markis sian aŭtoron klara stilisto kaj homo de elstara rakontista talento. Ankorau ĝi restas eble la plej populara el liaj ĉefverkoj. Sekvis tiun la naive simpla Jozef kaj la Edzino de Potifar, 1926, kaj La Vila Mano, 1928, intimkona bildo el kamparana holanda vivo, en kiu ankorau

montriĝas emo de B. al neverŝajneco. — Sekvavice gravaj estas liaj grandiozaj tradukoj: la strange elektita La Leono de Flandrujo, 1929, el la flandra de Conscience; la peztema sed bone tradukita Imperiestro kaj Galileano, 1930, el la norvega de Ibsen. Ambau ĉi verkoj estis kronitaj de la Akademio. Jane Eyre, 1930, laŭ la angla de Ch. Bronte sufiĉe bone transvivis malzorgan tradukadon por resti ankoraŭ tre interesa rakonto, dank' al ĝia esenca valoro. Ankaŭ aperis en 1926 La Malgranda Johano, el la holanda de van Eeden. Kiel poeto B. eldonis nur La Du ŝipoj, 1909, pro kiu li ricevis premion el Barcelona. Por la teatro li verkis en 1908 la laŭritan Onklo el Ameriko, 1922, dramon Malriĉa en Spirito kaj tradukis laŭ germana teksto en 1910 Salome, dramon de la anglo Wilde. — El liaj ceteraj verkaĵoj menciindaj estas: tradukoj Taglibro de Vitaĝ-pedelo, 1921, kaj Josefa, 1922, ambaŭ el la dana de Blicher; kaj en 1928 Karaktero, el la holanda de Luis-cius (tiu verko aperis ankaŭ en fina, ĉeĥa, itala, kataluna lingvoj, trad. ĉiuj el la E teksto.) Liaj nau leglernolibroj, plejparte por holandaj getuloj, kaj lia porjunula reverko de Robinsono Kruso, estas konsciencie faritaj. — Nun B. tradukas Don Kihoto el la hispana kaj verkas ankoraŭ romanon por gejunuloj. — La plej longtrakta komentariisto de la verkoj de B. estas Nekrasov, kiu verkis ampleksajn kritikojn pri liaj originalaj romanoj laŭ la marksisma vidpunkto por la antaŭskisma »La Nova Epoko« (okt. 1929 — febr. 1930) kaj por la postskisma »La Nova Etapo« (1932). Tiu tamen estas tro marksisme tendenca por trovi ĝeneralan samopiniecon. — La stilo-lingvaĵo de B. estas simpla, klasika, senornama. Oni malfacile trovas en ĝi provojn al »impresionisma« eksperimento. Li estas pli ĝuste nomata teĥniko de rakontoj ol konscia »evoluiĝanto« de nia lingvo.

R. BANHAM.

Bulyovszky (bujovski) Gyula, hungaro, d-ro, kuracisto en Kiskunmajsa.

Nask. en 1890 en Budapeŝt. E-isto de 1908. Fondinto kaj prez. de la studenta grupo en B. kaj red. de *La Pioniro*. Inicatis la fondon de Universala Studenta Unio, 1909, kiu havis »konsulojn« tutmonde. Ĉefsekr. de HES en 1912. Artikoloj, tradukoj, poemoj en H E-isto, H Studento, Belgia E-isto, Voĉo de Kuracistoj, Int. Med. Revuo ktp.

Bünemann August Oskar, germano, komercisto. Nask. 19 jun. 1885 en Hamburgo. Ofte restadis en eksterlando; parolas 11 lingvojn kaj komprenas 4 pluajn. Pioniro en la vegetara, libera, pacifista kaj socialista movadoj. Konatiĝis kun E en 1905 en Paris. LK. Fervora kursgvidanto en Hamburgo. En 1914 fondis la gazeton *Vegetarano*, kiun ĝis 1932 li lerte redaktis. Trad. dramon de Ibsen: *Reaperantoj*, verkis versojn, multajn artikolojn en kaj pri E. Kunlaboranto de la *Enciklopedio*.

Burger Josef, (ps. Kastelano), germano, karbministo. Nask. 21 jul. 1881 en Clarenthal-Saarbrücken. E-isto de 1913. Militservis 3 jarojn, varbis kaj instruis E-n ĉie, eĉ en la tranĉeo. Postmilito multaj kursoj en Essen kaj ĉirkaujaĵo. De 1921 ano de SAT, poste de ties Lit. Sekcio. Gvidis int. korespondadon en E por la Proleta Liberpensula Asocio en la Ruhr-regiono. Verkis kaj mem eldonis lernolibron g-lingvan por infanoj, 1926. Socialista poeto. Liaj kantoj, poemoj, rakontoj kaj artikoloj abundas en la SAT-organoj kaj LEA-eldonaĵoj. Fekunda kantisto de aktualaĵoj. Li preferas la formon de kantoj, en kiuj li esprimas sin senpere, ne miskompreneble per simplaj vortoj. Li ne estas amiko de la poeziaj bombastoj, sed la ioman sekond de liaj ofte satirecaj versoj rekomencas tiuj socialistaj instruoj kaj profundaj pensoj, per kiuj plenas liaj strofoj. Ankaŭ en la rakontoj li montras nenian emon al romantiko kaj sentimentalismo. Li ĉiam instruas kaj semadas socialismon. De marto 1933 elmigrinto el Germanujo. EMBA.

Burgemeister (burgemaĵster) Willy, ĉeĥoslovako, kontoristo; nun E-

instr. Nask. 26 jun. 1908 en Varnsdorf, Ĉeĥy. En 1930 li entreprenis E-an studvojaĝon tra 16 landoj. Ekde 1931 li restadas en Svedujo, kie faris proks. 150 publikajn paroladojn, 40 kursojn komencajn kaj daŭrigajn. En 1932 paroladoj en Holando.

Burn George Wilson, anglo, kuracisto. Nask. 30 junio 1847 en London. Instruisto por la korespondaj kursoj de BEA 1926—32. Verkis por diversaj gazetoj, precipe por *The E Monthly* 1912—22.

Butin Max, germano, instruisto kaj komercisto. Nask. 17 febr. 1888 en Bad Godesberg. E-isto de 1905. LK, multe kunlaboris (recenzis) por HDE. Multe propagandis dum 25 jaroj per gazetartikoloj, gvido de kursoj ktp. Verkis: *Faŭsto*, konciza komentario a. la unua parto de la dramo, 1923; *E' gvidlibro por la komercisto* (G-lingve), 1926; kunlabore kun Kreuz: *G E Konversacia Libro*, 1924; kunlabore kun Jahn: *E korespondado por la komercisto* (G-e), 1923; kunlabore trad.: *Sinjoro Herkules*, teatraĵo, 1909.

Butkus Vladas, litovo, gimnazia instruisto. E-isto de 1920. Prez. de LEA kaj Kaunas-a ES. Gvidis kursojn. Kunlaboranto de kelkaj gazetoj.

Butler Montagu Christie, anglo, sekretario de BEA (1916—34); muzikisto (harpisto, instruisto de diversaj muzikiloj, kantado kaj komponado). Nask. 25 jan. 1884 en London. Kvakero, vegetarano; diversaj premioj ĉe la Reĝa Akademio de Muziko, London. E-isto de 1905. De tiam instruis E-n. LK de 1922. Tradukis i. a. *Fundamentoj de la Kvakerismo*; valoraj kolektoj: *E-a Kantaro* (358 kantoj) kaj *E-a Himnaro* (212 himnoj). Adaptis *Pitmanan Stenografion al E*, verkis lernolibrojn. Red. de *The B E-ist*. Ĉefkunlaboranto de la *Enciklopedio*.

Butler Thomas Robinson, anglo, pastro anglikana, patro de M. C. B. Nask. 10 junio 1846, mortis 23 majo 1923 en Kingston-on-Thames. Pioniro de »Tonic Sol-fa« muzikinstruado.

Muzikisto, oratoro, poeto. E-istiĝis 1906. Multaj E-predikoj, poemoj (ekz. en *Kantaro* kaj *Himnaro*). Fer-
vora propagandisto.

Buxbaum (buksbaum) Leopold, po-
lica konsilisto en Wien. E-isto de
1914. Sukcesis envicigi E-n en la po-
lican faklernejon en W. kaj atingi, ke
la policanoj ricevis oficialan E-insign-
on, imititan de aliaj landoj.

Buxton Charles Roden, advokato.
Nask. 27 nov. 1875. Plurfoje membro
de la angla parlamento. Eldonis multe
da verkoj pri demandoj politikaj kaj

internaciaj. Scias E-n kaj publike re-
komendis ĝin.

Bye Rosa, norvegino, instruistino
en Oslo. Nask. 23 aŭg. 1883. E-ist-
iĝis febr. 1906, sekr. de EK en Oslo
1906—12, membro de gazeta komit-
ato 1908, kunfondinto de asocio de
N geinstruistoj E-istaj kaj ĝia prez.
1915—23. Gvidis multajn kursojn
1908—20, i. a. inter blinduloj 1911.
Kolektis kaj sendigis al la Int. E
ekspozicio en Oviedo, Hispanujo,
sept. 1929, laboraĵojn de lernantoj kaj
ricevis la unuan premion.

Cacciapuoti (kaĉapuoti) Giovanni, italo, d-ro. Pioniro en Napoli dum la fruaj tagoj de E.

Cachon (kaŝon) Hector, franco, tipografo. Nask. 11 marto 1891 en Sens (Yonne). E-isto de 1910. Unu el la unuaj membroj de FEO kaj de SAT. Gvidis kelkajn kursojn en Paris. Sekr. de FEO, 1924—33, SAT direkciaro 1927—32.

Calais. (kale). Havenurbo kaj banloko en Francujo; 72.000 loĝantoj; loko de la unua iom grava int. E-kunveno. La E-grupo de Calais kaj la angla havenurbo Dover, utiligante la kuradon de la aŭtomobilaj boatoj, organizitan de la Aŭtomobila Klubo de Francujo, decidis aranĝi int. feston en E. La inviton akceptis pli ol 120 E-istoj (laŭ Privat 200, laŭ UEA-Jarlibro 1932 180) plejparte de Britujo kaj Francujo, krome Capé el Alger, Stavenhagen el Berlin, Seynaeve el Courtrai (Belgujo) kaj Kühnl el Praha. 7 aŭg. 1904 oni malfermis la kunvenon en Calais, prezidis kapitano Capé-Montroisier. La kongreso diskutis la demandojn: 1. Pri la akcento tonika; oni alprenis la decidon: »Ni devas ĝuste konservi la tonikan akcenton; la profesoroj devas insisti pri la utileco de tiu regulo«. 2. Pri la ortografio de la personaj kaj urbaj nomoj. 3. Pri E-ista signeto; oni decidis: »La signo de la rekonon por la E-istoj, kiun oni rekomendas por la kunvenoj k. c., estas la verda kvinpinta stelo«. La 8-an la partoprenantoj per vaporsipo »La Nord« vojaĝis al Dover, kie la E-istoj akceptis la gastojn entuziasme. Oni disiĝis nur je la 11-a vespere, kiam la gastoj forvojaĝis sur la sama ŝipo. En ambaŭ urboj de la festo okazis oficialaj akceptoj de la

urbestraroj, bankedoj kun festparoloj ktp. La kongreso signas la komencon de la UK-j. I. SIRJAEV.

Cambridge. Universitata urbo en Anglujo, 58.800 loĝantoj. — 3-a UK 12—17 aŭg. 1907, 1317 partoprenantoj el 35 landoj; provo de int. monsiestemo: spesmilo. Unuafoje ŝtata registaro (Belgujo) reprezentis sin dum E-kongreso.

Cameron (kameron) Percy James, (Norémac), brito, oficisto. Nask. 5 sept. 1884 en London. Liberpensulo, vegetarano, kontraŭmilitulo. Eklernis E-n en 1905. Sekr. de Londona EK 1912—16. Verkis recenzojn por British E-ist, E kurson por sindikataj gazetoj kaj okazajn artikolojn.

Camosato (kamozaŭto) Benjamin, brazilano, dentkuracisto. Fond. kaj unua prez. de »Societo Sankta Katarino« (1907) en Florianopolis, kaj de »Sud-Brazila E-istigilo« (1927) en Porto Alegre. Dir. de la revuo »Brasil Filatélico«, kiu publikigas artikolojn en kaj pri E.

Campanile (kampanile) Enrico, italo, reĝa notario. Nask. 4 nov. 1861. Prez. de Napola E Grupo, Fervora prop-isto; gastamo kaj bonhumoro.

Cannes. (kan). Franca urbo, »Perlo de la Riviera«; 45.000 loĝantoj; la unua urbo en la mondo, kiu uzis E-n por la trafikindikado. v. Trafiksinaloj.

Canuto (kanuto) Giorgio, italo, d-ro med. kaj jura, univ. prof. de jurmedicino en Torino. Nask. 3 jun. 1897 en Torino. Interesiĝis pri E de post 1925 kaj komencis sian agadon per instruado kaj prez. de la loka grupo. De 1928 vicprez. de IEF. Akcelis la kunlaboradon de gvidantaj

italaj E-istoj. En 1929—30 kurso per radio (Torino). Membro de la reorganiza komitato, Paris, 1932. Prop. artikoloj; sciencaj studoj en *Int. Medicina Revuo*.

Capdevila i Buil Eduard, kataluno, presisto. Nask. 9 jun. 1906 en Barcelona. E-isto de 1921. Prez. de loka EG. Kas. kaj sekr. de KEF, afergvidinto de K-a Antologio, red. de K-a E-isto depost 1931. Ĉefkunlaboranto de la *Enciklopedio*.

Capé (kape) Auguste, (ps. Auguste Montrosier), franco, kapitano. Nask. 4 jul. 1868, mortis 1916, ĉe la milito. Tre fervora propagandisto, faris multajn paroladojn, precipe dum sia restado en Alĝerio kaj tie fondis nombrajn grupojn, gvidis nombrajn kursojn. De 1904 artikoloj en E-aj gazetoj. La 7 aŭg. 1904, en Calais, (v.) li prezidis kunvenon de E-istoj, kiu estis la »patrino« de niaj UK-j. En 1905 iniciatis la fondon de la gazeto Alĝeria Stelo. Fondis kaj direktis la ilustritan revuon *Tra la Mondo* (1905—1908). Trad. de Coppée: Unua ĉapitro de miaj memorskriboj, 1905. L. K. de 1905.

Carbonell y Bosque Antonio, hispano. De 1908 estas seninterrompe del. de UEA (Alcira).

Carles (karl) Alphonse, franco. Mortis en 1930. E-isto de 1898 (almenai). En 1904 fondis la grupon de Béziers. En 1906 iniciatis la E-ajn konsulojn, komenco de UEA (v. T. Rousseau). Verkis: Kurludo de toroj, 1909. Estis komitatano kaj hon. membro de UEA.

Carolfi (karolfi) Modesto Eugenio, italo, pastro. Nask. 5 aŭg. 1884 en S. Giorgio Piacentino. E-isto de 1912. Gvidis pli ol 200 E kursojn. Tre multe laboris por E. Liaj verkoj: *Gvidlibro de Banurbo Rimini*; *Malgranda Biografio de S. Francisko*; *Preĝlibreto*; *Padova Lilio*, biografio de S. Antonio el Padova; *Katolika Preĝlibro*; *La Reformanto*, biografio de S. Francisko el Assisi; kaj multaj gazetaj artikoloj.

Carreira (karejra) Saldanha Jorge de, portugalo, bankoficisto. Nask. 12 jan. 1887. E-isto de 1913. Li estis

la unua E-ista oficiro, kiu havis la permeson oficiale uzi la E-an distingilon sur sia maniko. (1917). Dum la milito en la tranĉeoj de Fauquissart li nomis la koridoron paralelan al la unua tranĉeo Z-E-Avenue. Lia komandanto en sia verko: »En la centra roto estas du kuriozaj figuroj, du vicĉefoj. Unu, Saldanha Carreira, malgrandeta, maldika, ĉiam modera, montrante ion samtempe malgajan kaj malsanan. Li havas la E-an pasion, kiu devigas lin eĉ propagandi al la serĝentoj, kun kiuj li parolas kaj al kompatindaj mallertaj soldatoj, kiuj lin rigardas surprizataj ktp.« Li helpis starigon de PEA. De 1932 malfermis dialogan kurson kaj serion da paroladetoj pri E ĉe Radio Stacio CT IAA-Lisboa. LK de 1930, Ĉefdel. de UEA. Ĉefkunlaboranto de la *Enciklopedio*.

Carro (karro) Santiago, hispano, gazetisto. Pioniro en Hispanujo, 1901. Fama prop-isto en Coruna.

Cart (kar) Théophile, franco, prof. Nask. 31 majo 1855 en Saint-Antoine (Dordogne), mortis 21 majo 1931 en Paris. Faris superajn studojn en Basel, Berlin, Roma kaj Paris. Rimarkinda lingvisto, scipovante sep lingvojn, li estis sendita de la franca registaro en Svedujon, por instrui francan beletristikon ĉe Upsala Universitato (1891—92). Prof. en liceo Henri IV en Paris (1892—1921) kaj en la Lernejo de Politikaj Sciencoj (de 1893). Prez. de la Lingvistika Societo en Paris. — C. ricevis gramatikon de E jam en 1894. Sed li ĝin lernis nur post apero de artikolo de Bourlet en *Revue du Touring-Club*, en 1901. Tuj komencis tiri diversajn kursojn, kaj publikigis *Iernolibrojn pri E*, kiuj altiris la atenton sur lin, ĉar ili farigis klasikaj kaj estis tradukitaj en multajn lingvojn. Administris la Presan E-an Societon, kiu eldonis L. I. Skribis en tiu gazeto, poste direktis ĝin (de 1907), dediĉante al tiu tasko, en teruraj malfacilaĵoj, ĉiujn siajn fortojn kaj rimedojn. Vicprez. (1905—03), poste prez. (1909—12) de la SFPE. — De la fondo estis ano de LK kaj de la Akademio. Direktoro de la Komisiono pri komuna vortaro (1908). Prez. de

la Akademio (1920). — Nelacigebla apostolo, li skribis en multaj E-gazetoj, paroladis ĉie, kaj dum tridek jaroj propagandis kaj batalis por E. Ĉiuj konis la respektogatan »Blankbarbulon«, ĉiam viglan kaj spiritunan. Sed sur du kampoj pli speciale li batalis. — Jam en 1903 li komencis sian porblindulan agadon. Li komprenis, ke nur lingvo int. povas iom mildigi la teruran izolecon de ĉiulandaj blinduloj, kaj kreis la brajlan gazeton E-a Ligito (1904). — Sed precipe li estis la »Fundamentisto«. Sian plej grandan meriton li akiris dum la kriza tempo 1907—08, kiam la apero de Ido minacis disigi la E-istojn kaj ruinigi la movadon. Li metis sian tutan energion, kapablon kaj temperamenton al la kontraŭbatalo de la skismo, kaj sukcesis dank' al siaj insistaj korprenmaj admonoj. De tiu tempo, kaj poste kiel prez. de la Akademio, li senĉese bataladis kontraŭ ĉiu ŝanĝo en la lingvo, kiu ne estus la rezultato de natura evoluo. »Ni fosu nian sulkon«, jen lia ĉiama konsilo, kiu signifis: »Ni laboru, restante fidelaj al nia senŝanĝa Fundamento«. Dum tiu batalo li renkontis kiel malamikojn kelkajn el siaj amikoj, faris gravajn personajn oferojn, sed ne cedis eĉ unu colon. — Krom sennombraj artikoloj kaj prop. broŝuroj por la publiko aŭ por la blinduloj, li verkis: kun kunlaborantoj, tutan serion da lernolibroj, el kiuj la plej fama estas E en 10 leĉons (1902), trad. en multajn lingvojn, kursojn pli elementajn kaj ankaŭ Vocabulaire français-E et abrégé E-français (1903); Plena Klasika Libro (1912); kaj sola: E-a Radikaro (1906); Raporto pri E al la Ministro de Publika Instruado (1907); Bilettoj de Blankbarbulo (1913—17 en E); Vortoj de Prof. Cart (1927); Pri Landonomoj (1927). L. BASTIEN.

Carvalho Adelino de, portugalo, bankoficisto. Nask. 13 jun. 1871, mortis 30 jan. 1929. Vigla agado en Lisboa Socio, 1914—17.

Casanovas Genover (henover) Josep, kataluno, teol. d-ro, sacerdoto, prof. de latina lingvo en Girona.

Nask. 23 febr. 1884 en Armentara. E-isto de 1911. Fond. de kelkaj EG-j, skribis multajn por- kaj en E-ajn artikolojn, celebris meson kaj predikis en kelkaj kongresoj de KEF, kies kunorganizinto li estis. Estis prez. de Int. Floraj Ludoj, komitatano por gastigo de aŭstriaĵ infanoj post la milito pere de E. Religia cenzuristo de Espero Katolika.

Casari (kasari), aŭstro-germano, d-ro, prof. mezlerneja en Wien. Kunverkis la unuajn ministerie aprobitajn E-lerno- kaj legolibrojn por aŭ. lernejoj, 1927, 1929.

Casas (kazas) Pedro, urugvajano. librotenisto kaj ĵurnalisto, poste ing. de radio. Nask. 29 jun. 1893 en Mosquitos. E-isto de 1913. Estis sekr. kaj prez. de UES. Ĉefa aranĝinto de la I-a Sudamerika E Kongreso.

Cases Martin Miquel, kataluno, urba oficisto, aktoro kaj teatro-dir. ĉe amatoraj rondoj. Nask. 16 jun. 1863 en Cartagena. E-isto de 1906. Estis prez. de Espero Kataluna, ĉefred. de Tutmonda Espero, senlaca prop.-isto, konstanta korespondanto de int. E-gazetaro dum 1907—1914. Aŭtoro de tri amuzaj broŝuroj: Unu fojon, Vivu E, kaj Mistera krimo, (1908—10).

Cassel. Urbo en Germanujo; 171.000 loĝantoj. 3-a kongreso de SAT 11—15 aŭg. 1923; ĉ. 250 partoprenantoj el 18 landoj. Honorprez. prof. Einstein. Propono pri komunistigo de SAT farita de SEU-anoj estas reprenata. BRUIN.

Caw (ko) Janet, skotino, instruistino. Nask. 24 marto 1884 en Edinburgh. Magistro (Edinburgh-a Universitato). Instruas E-n en la loka grupo; tradukis kantojn, verkis poemojn.

Cecil (sesil) Robert, Lord, of Chelwood, anglo, eksministro. Nask. en 1864. Kiel delegito de Sud-Afriko ĉe la Ligo de la Nacioj, estis en 1920—21 fervora subtenanto de E. Laŭ lia eldiro »helpa mondlingvo ne estas bezonata nur de la intelektuloj, sed antaŭ ĉio de la popoloj mem.«

Cech (ĉeh) Rajmund, ĉeĥa aŭstriano, ŝtata kalkuloficisto. Nask. 2 majo 1896 en Wien. E-isto de 1912. Kas., sekr., kaj nun prez. de la ES

»Danubio« en Wien. Aktive partoprenas ankaŭ en la laboro de la ligitlandaj E-organizoj. Prop. vojaĝo per lumbildoj en Hungarujo kaj Jugoslavujo, 1930. Depost 1920 gvidis kursojn. Tradukaĵoj en Germana E-isto, Aŭstria E-isto kaj HDE.

Cense (sans) Eugénie Française, francino, multjara administrantino de Centra Oficejo. Nask. 9 apr. 1883 en Sd. Judoce. Ŝi vizitis la universitaton en Paris. Dum 1901—08 kaj ankaŭ nuntempe loĝas en Polujo. En 1901 konatiĝis kun Volapük, sed baldaŭ fariĝis E-istino. Gvidis multajn kursojn en Łódz, Polujo. De 1908 post reveno al Paris oficistino de C. O. dum 15 jaroj. En 1910 la C. O. delegis ŝin por helpi al la organizo de la Kongreso de Int. Asocioj en Bruxelles, en 1913 partoprenis en la nomo de C. O. la duan Kongreson de Int. Asocioj en Bruxelles-Gand kaj la Kongreson de Bibliografio. Dum la milito ŝi dediĉis sin plene al la laboroj por Ruĝa Kruco, en la kunago de la germanaj E-istoj pere de Holando, Skandinaviaj landoj kaj Svisujo. Tio faris ŝin suspekta, ĉiu korespondaĵo al ŝi estis kontrolata. Sekr. de la UK en Barcelona, Bern, Praha, red. de *Bulteno por informi* eld. de C. O., 1915—18. Tradukis al E la francan romanon *Fatala ŝuldo* de L. Dalsace. E. WIESENFELD.

Centra Esperanto-Boekhandel estas societo en Hago, kies ĉefa agado estas disvendo de E-libroj. Post la disdono de dividendo (5—7%) la firmo ĉiujare donacas konsiderindan sumon al diversaj E-celoj.

Centra Oficejo, v. Esperantista Centra Oficejo.

Centra Presejo Esperantista. Tiun presejon fondis en Paris en 1904 la Presa Societo E-ista (v.). En 1908 ĝin akiris Viktoro Polgár kaj ĝin daŭrigis sub la sama titolo. La presejo ankoraŭ hodiaŭ ekzistas, kaj presis multnombrajn E-ajn gazetojn kaj librojn. Oni presis tie gramatikojn kaj vortarojn E-ajn por diversaj lingvoj. La laboristaro parolas E-e, kio plifaciligas la laboron. Post la morto de V. Polgár (9 jul. 1933) la presejon daŭrigas lia frato I. J. Polgár.

Ejo ekde komenco: 33, rue Lacépède, Paris, 5. Laŭ I. POLGÁR.

Cent tridek tri tagoj. Historia skizo de la hungarlanda proleta revolucio en 1919, kompilita el artikoloj de ĝiaj gvidantoj kaj aktivuloj. Ekrelo, 1931, 142 p., kun ilustraĵoj.

C. E. R. Bumy ps. de Kalocsay en la *Parnasa Gvidlibro* (La Arto Poetika). Lingvo Stilo Formo kaj LM.

Cesarini (ĉesarini) Fidia Romeo Giuseppe, italo, ŝtata ĉefoficisto en financoj. Nask. en Panicale. E-isto de 1915. Ricevis superan diplomon de Itala Katedro de E. En suda Italujo li faris eksterordinaran propagandon: paroladoj, artikoloj en tre gravaj gazetoj; kursoj.

Champion (ŝampjon) Paul, franco, licea prof. en Avignon. Mortis en 1914. Fondis grupon en A. Bonaj tradukoj: *Reĝlando de Rozoj*, de Houssaye; *Sinjoro Vento*, de Paul de Musset; *Mirejo de Mistral*, la lasta kunlabore kun Noël. (Laŭ UEA-Jarlibro 1927).

Chapelier (ŝapelje) E., belgo. Mortis 17 marto 1933. Kunlaboranto al *Int. Socia Revuo*. Verkis prop. broŝuron kaj kunverkis raporton pri temo *La anarhistoj kaj E*; aperinta en franca kaj angla lingvoj.

Chaussegros (ŝosgro) Vincent, franco, prof. Nask. jul. 1861 en Brioude (apud St-Etienne), mortis 12 sept. 1932 en Brioude. E-isto de 1902, sekr. de la Pariza Grupo antaŭ la milito; de 1907 redaktis la monatan bultenon *Paris* — E. Kunorganizinto de la UK, 1914.

Chavet (ŝave) Gabriel, franco, licenciato de leĝoscienco, komerca direktoro. Nask. 14 dec. 1880 en Digoen (apud Mâcon). Kunlaboris al diversaj pacifistaj societoj kaj revuoj. De 1922 sekr.-kas. de la »Ligue Int. de la Paix et de la Liberté«, unu el la plej malnovaj pacifistaj asocioj (1867), kaj zorgas pri la publikigo de ĝia bulteno. Li en aŭg. 1896 lernis sola la lingvon. En jan. 1897, tiam studento en la gimnazio de Louhans (apud Mâcon), li tie fondis kun kolegoj de la lernejo la Klubon E-istan de Louhans, la unuan klubon fonditan en Francujo. Li verkis prop.

artikolojn kaj polemikis pri E kun la fama franca ĵurnalisto Fr. Sarcey. En 1900 fondiĝis la Grupo E-ista de Parizo, kies sekr.-kas. li estis. En 1903 pro malsano li rezignis tiun oficon.

Kiel sekr. de la Centra Oficejo, de 1905, li ageme partoprenis la organizon de la UK-j 1906—1914. Li estis ĝen. sekr. de ĉiuj tiuj kongresoj kaj redaktis la oficialajn raportojn. Li ankaŭ prenis sur sin la sekr. laboron de la Lingva Komitato, zorgis pri la redaktado de la Oficiala Gazeto E-ista kaj pri publikigo de ĉiuj gravaj laboroj eldonitaj de la Centra Oficejo pri statistiko, bibliografio ktp., ekz. E-ista Societaro, (nomaro de ĉiuj grupoj kaj organizoj); Principoj de Decimala Klasigo kun apliko al E 1908. — Li starigis kun Privat la regulojn de la kontrakto de Helsinki, kiu daŭris de 1922 ĝis 1932. — C. estis prez. aŭ sekr. de diversaj E-istaj grupoj, sekcioj aŭ asocioj, faris multajn prop. paroladojn kaj kursojn, fondis kun Warnier la »Librairie de l' E« en 1906. Dum la milito li instigis la Subministron de la milita sanitara servado, Justin Godard, ke li sendu oficialan cirkuleron por rekomendi al ĉiuj. militkuracejoj disdoni al la soldatoj gvidlibrojn de la Ruĝa Kruco en diversaj lingvoj kun traduko en E de la frazoj necesaj al la militvunditoj. — Nuntempe li daŭrigas sian prop. agadon en Lille, kie li prez. la lokan grupon. — Li fondis la unuan asocion de francaj poŝtistoj E-istaj, kun publikigo de broŝuro, 1911; li partoprenis en la fondo de asocio de pacifistaj E-istoj kun kunlaboro al la revuo *Espero pacifista* (1905—06); en la fondo de la Rotaria E-o Amikaro, 1928; kaj ĉiam laboras en la rotariaj rondoj por E. — Li verkis por diversaj E-aj ĵurnaloj artikolojn pri itala, flandra kaj hispana artoj kaj speciale en la *Revuo gravan verkon pri la pentristo El Greco*, premiitan en la Floraj Ludoj. Krome li verkis: kun Warnier, lernolibron *E-Manuel*, 1907 (55000 e-roj venditaj ĝis 1932); *Corrigé d'E-Manuel*, 1912; kaj *F-E vortaron*; sola: *Grasa Lignajisto*, trad. de

itala novelo, 1906. L. K. de 1909. Ĉefkunlaboranto de la *Enciklopedio*. L. BASTIEN.

Chiba (ĥiba) aŭstro-germano, oficisto en Wien. Nask. 2 jul. 1873. Lernis Volapükon en 1888, E-n en 1917. De 1921 prez. aŭ vicprez. de AKLE, poste Kat. Unio E. Arangiĝis de multaj jaroj ĉiumonate E-diservon en W. En la kadro de Katolika Kunvenego en 1933 aranĝis E Katolikan Kongreseton en ĉeesto de episkopoj.

Chilard (ŝilar) Lionel, franco, filatelisto. Nask. 23 majo 1883 en Courbevoie (apud Paris). E-iĝis 1905. Komitatano de SFPE. Gvidis multajn kursojn kaj prez. grupojn en la ĉirkaŭaĵo de Paris. Agas propagande ĉe la Iniciativa Sindikato por turismo en Versailles (ties konsilanto), kaj en la »Centre d'Etudes Internationales« en Parizo.

Chitty (ĉiti) Wilfred, brito, muelisto. Nask. 11 jul. 1874 en Dover. E-istiĝis en 1904. Sekr., poste prez. de la loka grupo. Ĉeestis la 1-an UK, akceptis Z-n en Dover. UEA-del, rotariano.

Christaller (kristaler) Paul Gottfried, germano, desegnisto, modlisto, ĉizelisto kaj prof. por tiuj fakoj en la ŝtata artmetia lernejo en Stuttgart (de 1927 pensiita). Nask. 21 aŭg. 1860 en Basel, Svisujo. Destinata unue por la misiista evangeliana servo, li lernis afrikajn lingvojn, poste studis artmetion en G kaj Italujo. Diversaj liaj artverkoj troviĝas en Stuttgart, Winnenden kaj Kamerun. E-isto de 1904. Fondis en jan. 1905 la grupon en Stuttgart, kies prez. li estas ĝis nun. Vicprez. de GEA, 1913—20. LK dekomence kaj akademiano de 1911. Vasta prop. laboro en Suda G. Verkoj: sep prop. broŝuroj; gramatika verko, 1909; *Vortaroj E-G*, 1923, kaj *G-E*, 1910 kaj 1923; *Formulo pri alarmo*, (trad.), 1908; *Propraj nomoj*, 1911; *Al eterna paco* (trad. de Kant), 1924; *Modelaj leteroj por komercistoj* (trad.), 1927. Kunlaboranto por multaj E gazetoj.

Christanell (kristanel) Franz, aŭstrianano, d-ro, pastro kaj gimn. prof. de matematiko kaj fiziko en Salzburg. («Borromaeum»). Nask. 14

jun. 1880 en Meran (nun en Italujo). Kun E li konatiĝis per d-ro Pezleeder en 1920. En 1921 kunfondis neutralan grupon en S. kaj restis ties animo. En 1925 prez. de la Aŭ. E Kongreso en S. kaj en 1926 prez. de AED. Gvidis multajn kursojn, nun laŭ Cseh-metodo. Enkondukis E-n kiel oficialan libervolan fakon en sia lernejo jam en 1922 kaj en 1928 fondis IKUE-grupon por studentoj kaj pastrokandidatoj. Verkis prop. broŝuron, 1924, gvidlibron pri S., 1924, libreton *La Vero pri Suda Tirolo*, 1926, kantaron de la EG S., 1930, kronikon de la SEG, 1931, kaj trad. du prop. enhavajn teatraĵetojn, 1922 kaj 1923. Serio de prop. teatraĵoj originalaj, prezentitaj okaze de Z-festoj; k. a. en manuskripto.

Christensen (kristensen) Alf, norvego, komercisto kaj konsulo en Kristiansand, instruisto de lingvoj. Nask. 10 majo 1900. Studis komercion en Francujo, Anglujo, Germanujo kaj Hispanujo. E-isto de 1908. Prez. de »Sörlandets E-sammenslutning«, 1920. Revigliĝis 1931 kaj estiĝis vigla kaj ideo-riĉa prop.-isto per gazetoj paroladoj en radio kaj en multaj asocioj. Instruas E-n krom aliaj lingvoj ĉe la komerca gimnazio en K. Depost jan. 1933 red. de la *N E-bladet*.

Christensen Alfred, dano, kompostisto. Nask. 28 jun. 1886 en Nyborg mortis 13 jun. 1932. Vigle propagandis ĉefe pergazete. Prez. de CDEL dum 1927—32.

Christensen (kristensen) Parley Parker, usonano, advokato. Nask. 19 jul. 1869 en Weston (Idaho). Sekr. de Konstitucia Kongreso por krei ŝtaton Utah (1895); ŝtata advokato; ano kaj prez. de ŝtata parlamento 1910—12. Kandidato de Partio de Farmistoj kaj Laboristoj por prez. de Usono (1920). Vojaĝis ĉirkaŭ la mondo en 1920—22 uzante E-n. Vicprez. de EANA 1931—32. Instruas E-n en superaj lernejoj de Los Angeles kaj Pasadena (California).

Christie Sören Engesgaard, kand. de juro, redaktoro en Oslo. Nask. 30 jul. 1889. E-iĝis en 1907 per kurso en la gazeto »Urd«. Estrarano de EK

en Oslo 1908, iniciatoro kaj kunfondinto de NEL 1911. faris paroladojn kaj kursojn en Kristiansund, 1908, en Oslo 1908—11 kaj 1914—18, en Trondhjem 1916—17. Verkis lernolibron, 1912, 1000 ekz.

CK: Centra E-Komitato.

Clark, (klark) Walter John, anglo. Mortis 30-jara, 18 majo 1911. Financo kaj labore subtenis la movadon enlande kaj internacie. Verkis la bonegan historian verkon »Int. Language, Past, Present, and Future« (1907).

Clavenna (klavena) Attilio, italo, industriisto, libroteŝtisto. Nask. 22 jun. 1881 en Milano. E-isto de 1911, de tiam fervora prop-isto kaj prez. de la EG en Sampierdarena (Genova). Dum la milito estrarano de la landa socio. Diversaj kursoj. Membro de IKE.

CO: Centra Oficejo, v. E-ista Centra Oficejo.

Codorniu (kodorniu) Ricardo, hispano, arbara inĝ. Nask. 1846 en Cartagena, mortis 26 sept. 1923 en Murcia. Direktis la rearbarigon de Montaro Espuna, verkis profesiajn verkojn. Fondis la H. Societon por prop. de E 1 febr. 1903. Verkis la unuajn H. broŝurojn pri E. Kunlaboris al multaj E-gazetoj.

Cogen (kogen) Léon Paul Charles, belgo, d-ro pri leĝoscienco, pacjuĝisto en Ninove, antaŭe advokato. Nask. 18 sep. 1876 en Gent. Konas la ĉefajn eŭropajn lingvojn (krom slavaj), elpensinto de kalendarreformo (ankaŭ prelego dum Som. Univ., 1928); ktp. E-isto de dec. 1898 post legado de artikoloj de Lemaire en *Le Petit Bleu*. Vicprez. de BLE, prezidis postmilitajn belgajn E-kongresojn. Prez. de Int. Asocio de E-istaj Stenografiistoj. Klopodis enigi E-n en la int. kongresojn de stenografio. Verkoj: prozaj kaj versaj tradukoj el la flandra kaj franca lingvoj; multaj originalaĵoj kaj E-igoj de kantmuzikaĵoj; »La demando pri la plibonigo de l' Muzikskribo kaj ĝia solvo per la A ŭ t o n o m a M u z i k s k r i b a d o«, 1922, kies propagandon servas eta socio kreita de li en 1924. Red. de Int. Stenografiisto, artikoloj

en Belga E-isto, Suno Hispana. L. K.

Colas (kola) Claudius, franco, oficisto ĉe eldonejo. Nask. 29 nov. 1884 en Saint-Huruge (apud Mâcon), mortis 11 sept. 1914, ĉe la Marna batalo. Estis pioniro de E en franca katolikaro. Li kunlaboradis kun Richardson por starigo de IKUE, 1910. Red. de *Espero Katolika*. Fondinto kaj direktoro de franca prop. revuo *L'Église catholique*. Organizis la unuan Kongreson de Katolikoj E-istoj en Paris 1910; la 4-an en Roma, 1913, la 5-an en Lourdes, 1914, kies kuniĝon malhelpis la milito. Li faris multajn kursojn kaj paroladojn, ĉiam fervora kaj tiel ĉarme simpla kiel sindona; en Kanado ruĝhaŭtuloj alnomis lin »Katsenio« (Ārda Fajro). Li laboris en la Tutmonda Jarlibro, en la Oficiala Gazeto; redaktis multege da broŝuroj, artikoloj. Ni citu: Kristnasko, prop. broŝuro, 1911. La Lignoŝuoj 1914 — L. K. de 1910.

Collinder (kolinder) Erik Alfred Torbjörn. Univ. prof. pri finno-ugraj lingvoj en Uppsala. Nask. 22 julio 1894 en Sundsvall. Lerte defendis E-n en radio-diskutado mondlingva printempe de 1933. (Lia patro, gimnazia instruisto en S., estis E-isto, menciita en Jarlibro E-ista 1897.)

Collinson (kolinsn) William Edward, anglo, M. A., Ph. D., prof. de germana lingvo, hon. prof. de filologio kaj D-ro John Buchanan Lektoro de E ĉe Liverpool Universitato. Nask. 4 jan. 1889 en Birmingham. Eminentia lingvisto. Membro (kun Otto Jespersen kaj Edward Sapir), de Konsila Komitato por Lingvistika Esploro de IALA. (v.) En 1926 verkis La Homa Lingvo. Vicprez. de BEA, LK. Kunlaboranto de Literatura Mondo.

Comella Mora Jacint, kataluno, pentristo. Nask. 2 apr. 1879 en Vic. E-isto de 1902. Kursgvidanto, fond. de EG-j, sekr. de la komitato por gastigo de aŭstriaĵ infanoj post la milito, pere de E. Unuaj premioj ĉe la desegna konkurso por kongres-insigno de Antwerpen kaj Budapeŝt.

Conev Benjo, bulgaro, d-ro, univ. prof. de slava filologio. Nask. 1863

en Loveĉ, mortis en 1926. Demonstraciis sian simpaton por E, i. a. per entuziasma artikolo.

Coomans (komans) R., nederlandano. Kunfondinto de la unua laborista EG en Hago kaj red.-adm. de ties organo Lab. E-isto, 1910—11. Kunlaboris al Int. Socia Revuo.

Corret (kore) Pierre, franco, d-ro med. Nask. 1881. Lia pordoktoreca tezo, kiun li prezentis kun tre granda sukcesoj, estis: Utileco kaj ebleco de alpreno de int. helplingvo por la Medicino, Paris, 1908. Ankaŭ tre kompetenta pri Radio, elpensis aparatojn. Ĝen. sekr. de SFPE, 1908—11. Skribis en diversaj E-istaj gazetoj, kaj precipe en LI, kie, kun Cart, li energie atakis Idon, kontraŭbatalis ĉiun ŝanĝon aŭ neologismon, kaj partoprenis en la diskutoj inter Cart kaj Bourlet pri la vortaro Grosjean-Maupin (Franco-Esperanta) Sciencamanto li skribis en Int. Scienca Revuo, kaj turnis sian atenton precipe al la Radio. Prezidis »Int. Radio-Asocio« (fond. 1924); ĉefred. de »Int. Radio Revuo« (1926).

Krom multaj artikoloj, kelkaj broŝuroj kaj sia tezo, li verkis: Int. Radio-Leksikono sselingva, 1925. Raportoj pri la 2a, 3a, 4a, 5a Kongresoj, 1906—09. (La 2a kaj 3a kun Artigues). Trad. de Jules Romains, Knock, 1932, prezentita dum la XXIV-a Kongreso. LK, 1909, Akademiano, 1920. L. BASTIEN.

Cortezo (kortezo) Carlos, hispano, kuracisto, eksprez. de la ŝtata konsilantaro. Estis prez. de HEA kaj de la 6-a nacia E-kongreso.

Cosmetto (kozmeto) Gladys P., grekino angliginta, kantistino. Nask. 11 dec. 1889 en Highbury, London. Muzika direktisto de Nordlondona EK. Trad. de multaj kantoj. Fondis gazeton Londona Rondiranto. Nun s-ino Weston.

Cotton (koton) Aimé, franco, fama scienculo fizikisto, prof. ĉe la Pariza Universitato; ano de la Scienca Akademio. Nask. 9 okt. 1869 en Bourg. Li pristudis la interferojn, difrakton kaj polarizon de la lumo, la ultramikroskopojn ktp. La granda elektromagneto, pri kiu li parolis en la UK de Bern, 1913, estis realigata en 1924.

Tiun grandan ilon pezantan pli ol cent milkilogramojn C. instalis en laboratorio de Bellevue apud Paris; ĝin oni senĉese uzas por diversaj esploradoj, precipe pri la radioaktivaj ŝtofoj kaj la magnetooptikaj fenomenoj. E-isto de 1907, li ĉeestis dek UK-jn. Eksprez. de ISAE. kaj de la Fédération Universitaire E-iste de France. Prop. artikoloj en sciencaj kaj grandpublikaj revuoj.

L. BASTIEN

Courtenay, v. Baudoin de Courtenay.

Courtinat (kurtina) Leon, (ps. Esperido), franco, d-ro jura, komercisto, redaktoro. Nask. 6 majo 1894. en Etroussat (Allier). E-isto fariĝis dum 1915 en la militkaptitejo Münster i. W., kie li redaktis la hektografitan gazeton Antaŭen Verdsteluloj 1915—16, gvidis kursojn tie kaj poste en Limburg-a internigejo por francaj kaj rusaj samsortuloj. Fondis EG en Clermont Ferrand en 1922. Nun helpsekr. de E. G. Lyon. UEA ano de 1919, del. de 1922. Ĝen. sekr. de ILEPTO 1924—26. Gvidis kursojn, organizis la francan E-kongreson en 1925. Ĉeestis 5 UK-jn. Artikoloj en HDE ktp.

Couteaux (kuto) Jean, franco, d-ro de leĝoscienco, direktoro de granda hospitalo. Nask. 31 okt. 1884 en Sainghin-en-Mélantois (apud Lille). E-isto de 1904, jam en tiu jaro li fondis multajn grupojn kaj komencis ageman propagandon tra tuta Francujo. Li estis sekr. de la E-a sekcio de la »Latina Kvartalo« de 1911 ĝis 1914. En 1911 fondis, kaj redaktis kun Dubois, la int. revuon »Vekiĝo« por la defendo de E. En 1920 li restarigis la E-an federacion de la Pariza regiono kaj estis ĝia prez. ĝis 1928. Ludis ĉefan rolon en reorganizo de SFPE en 1922—1923, ĝen. sekr. de SFPE de 1923 li estas la animo de la propagando. Dum 30 jaroj li faris multajn paroladojn kaj artikolojn. Sed precipe per sia ĉiutaga agado, malgraŭ sia tre grava profesia funkcio, li havis plej efikan influon sur la vivon de E en sia lando. Preskaŭ sola dum longa tempo li prenis sur sin tiun pezegan taskon, iniciatante fondon de grupoj, korespondante kun ĉiuj, direktante

ĉion eĉ en la plej malgravaj detaloj. Nun ankoraŭ li estas la centra akso de la SFPE. Ĉiujare verkis modelajn raportojn, kiuj prezentas plenan historion de la prop. movado en Francujo. Trad. en ritma prozo de Richet: Sokrato, tragedio, 1914. LK de 1932.

L. BASTIEN.

Coutinho (kotinju) Antonio Caetano, brazilano, farmaciisto. Trad. la »Unuaj Lecionoj« de Cart. LK de 1905.

Couto Fernandes (kotu fernandiŝ) Alberto, brazilano, teknika telegrafa subdirektoro, emerita. Prez. de BLE, reelektita depost 1910, prez. de BKE. Prezidis la 2-an B. Kongreson de E. Gvidis tre multajn kursojn. LK-ano dum jaroj. Verkoj: E-a Radikaro; Amoperproverboj, trad. de Azevedo; lernolibro (kunlabore kun Mota Mendes). Kunpreparas kompletan Portugal-a-E Vortaron.

Courmont v. Avril.

Couturat (kutūra) Louis, franco, d-ro, prof. de filozofio, logikisto. Nask. 1868, mortis 3 aŭg. 1914 dum aŭtomobila katastrofo. Aŭtoro de la fama verko pri la mondlingvoj »Histoire de la Langue Universelle«, en kiu estas analizitaj ĉ. 60 projektoj de la paroloblaŭ artefaritaj lingvoj. »La fakta inspiranto kaj gvidanto de la Delegitaro« (v.) poste »la fakta gvidanto de la tuta Ido-movado.« (Drezen, Historio de la Mondlingvo, p. 182—96.)

Cox (koks) George, anglo, major-generalo. Mortis 27 okt. 1909. Servis en la brita armeo (1861—98) en Malto, Egiptujo, Sudafriko. E-istiĝis 1905, multe laboris por la gazeto The British E-ist. Eldonis propraŭte Grammar and Commentary on the E Language, 1906 (4-a eldono 1924). Partoprenis la tradukon de la Nova Testamento; eldonis tradukojn el Mil kaj Unu Noktoj.

Cozic (kozik) Louis, franco, inĝeniero. Prezidinto de la Asocio de la Inĝenieroj de ŝtataj publikaj laboroj. Nask. 27 febr. 1879 en Paris. Fervora propagandisto, prez. de la Fed. de la Pariza Regiono.

Cresp Charles, franco, fotografa informisto en Cannes. De 1908 seninterrompe UEA-del. Laŭ lia iniciato la

urbo Cannes uzas E-n por la trafikindikado.

Crowley (kroŭli) Ralph, anglo, kuracisto, medicina ĉefoficisto de la ministerio de instruado. Nask. 11 febr. 1869 en Croydon. Dumviva membro kaj vicdel. de UEA.

Csáder (ĉáder) Sándor, hungaro, en ĈSR, bankoficisto. Nask. 16 okt. 1902 en Šamorín-Somorja. E-isto de 1921; de tiam kas. de la la EG en Bratislava. Ĉefdelegito poste en 1927—31 prez. de TEJA. Laboras ĉe la skoltroj. E kunlab. de div. ĵurnaloj en Slovakujo. Noveltradukoj en E-J u n u l a r o, M a r t o k t p.

Csapó (ĉapo) Gyula, hungaro, lignokomerca oficisto. Nask. 23 febr. 1906 en Jimbolia (tiam Hung., nun Rum.) E-isto de 1921. Gvidanto de la movado en Timișoara.

Cseh (ĉe) Andreo, hungaro, katolika pastro. Nask. 12 sept. 1895 en Marosludas (nun Ludoŝul-de-Mureŝ en Rumanujo). Li paŝtriĝis en 1919 kaj kiel pastro agadis dum mallonga tempo en kelkaj urboj. E-isto de 1910. En 1920 en Sibiu li ellaboris sian faman kursmetodon, por kies sukceso li estis invitita al Targu-mureŝ (Marosvásárhely), kie li gvidis plurajn kursojn. De tie li iris al Cluj (Koloŝvár), gvidis kursojn kaj komencis reorganizi la E-movadon en Rumanujo. En aŭtuno de 1922 je invito de H. Fischer li transiris al Bucaresti kaj kun li fondis la E-Centron Rumanan. Du jarojn li prop-is kaj instruis tie kaj en najbaraj urboj. Li estis (de 1921) ĉefdel. de UEA. En 1924 lia episkopo grafo Majláth donis al li libertempon por tute dediĉi sin al la disvastigo de E. Samjare li fariĝis sekr. de ICK kaj ricevis komisionon fari prop. vojaĝon tra pluraj landoj; Partoprenis la organizaĵajn laborojn de la UK-j en Genève, Danzig kaj Budapeŝt. Aŭtuno 1927 SEF invitis lin al Svedujo kaj post prelegvojaĝo en la lando li faris kursojn en Stockholm, i. a. ankaŭ en la parlamento. En Svedujo komenciĝis lia triumfa apostolado tra la diversaj landoj. Liaj kursoj havis ĉie eksterordinaran sukceson, tiel, ke la E-gazetoj parolis pri la renesanco de E. En 1928 li gvidis kursojn en Estonujo.

En 1929 en Budapeŝt li donis sian unuan int. pedagogian kurson. En okt. 1929 oni vokis lin al Estonujo kaj Latvujo kaj ĵarfine ai Nederlando. En majo 1930 li fondis kun ges-roj Isbrücker la Int. Cseh-Instituton de E. Li fondis en 1932 la gazeton *La Praktiko*, kaj estas ĝia red. L. K. JULIA ISBRÜCKER.

Cseh-metodo. Ĝi dankas sian ekziston al la fakto, ke Andreo Cseh estis devigata gvidi E-kurson antaŭ diversnacia publiko, konsistanta plej-grandparte el laboristoj. Estis en 1920 en la transilvania urbo Sibiu (Hermannstadt, Nagyszeben). Lernolibroj ne estis haveblaj; mendi el eksterlando neeble, ĉar la limoj ankoraŭ fermitaj. Pastro Cseh decidis tiam ne doni kurson ĉar la ordinara senco de la vorto, sed simplan konversacion. Nigra tabulo kaj kreto helpis la instruiston, papero kaj krajono la lernantojn. Kun granda entuziasmo okazis la provo. Komence li parolis pri aferoj plej proksimaj kaj uzante nur la plej simplajn gramatikajn elementojn. Poste li transiris iom post iom al temoj pli malproksimaj kaj al gramatikajoj pli malfacilaj. Post 20 lecionoj de 2 horoj oni jam povis interparoli en E. Tiel la Cseh-metodo naskiĝis. La bona rezultato instigis al organizo de similaj kursoj en tuta Rumanujo, kaj poste sekvis invitoj ei pluraj landoj.

La metodo komencis sian triumfan vojon tra Eŭropo.

Pro kio la granda sukceso?

Ĉar la metodo estas adaptita al la psiĥo de la moderna homo. La principoj de la metodo estas la jenaj:

- a neuzado de lernolibroj
- b neuzado de nacia lingvo, sed klarigo de la novaj vortoj per la jam instruitaj
- c komuna ĥora respondado de la kursanoj
- d aplikado de konversacio pri aktualajoj anstataŭ uzado de lernecaj ekzemploj.
- e riĉa aplikado de humoro kaj ŝerco
- f instigo al tio, ke la lernantoj mem eltrovu la regulojn de la lingvo kaj ke ili mem konstruu la gramatikan sistemon.

Prefere la kurso estas donata de

fremdlanda instruisto, por efike plenumi punkton b.

Komence oni timis, ke la sukceso dependas nur de la personeco de Cseh, sed baldaŭ evidentigis, ke liaj disĉiploj de diversaj nacioj akiris similajn sukcesojn. Andreo Cseh ne deziras doni la tutan gramatikon en la komenca kurso, sed li volas formi grandan aron da entuziasmaj adeptoj, kiuj fervore daŭrigas la studadon kaj la propagadon. Estas interesa fakto, ke bonaj Cseh-kursoj finiĝas ĉie kun pli multe da lernantoj, ol kun kiom ili komenciĝis. La »Konversacio« de Cseh estas amuzaj vesperoj kaj oni ne rimarkas, ke samtempe oni akiras la plej potencan rimedon malfermi novan mondon.

Historio. La unuan kurson faris Cseh en Sibiu en 1920 por societo de laboristoj el 3 nacioj. Pro la granda sukceso de tiu kurso li baldaŭ ricevis inviton al la urbo Marosvásárhely, kie li faris sinsekve plurajn kursojn en la »Libera Universitato«. En 1921 ĝis 1923 li gvidis kursojn en Kolozsvár, Bucuresti kaj Ploesti. En 1924 li interrompis la kursgvidadon pro propaganda vojaĝo en Eŭropo. En 1927 Cseh gvidis grandajn kursojn en Danzig kaj en januaro 1928 li komencis siajn grandskalajn kursojn en Svedujo. En julio 1929 la urbo Budapeŝt aranĝis la unuan int. pedagogian kurson de Cseh. Similaj int. kursoj okazis poste en Arnhem (1930) kaj en Kraków (1931.). Krom tio Cseh gvidis grandajn kursojn en Estonujo, aranĝitajn de la Estona Instruista Asocio, en Latvuj, Dresden, Norvegujo, Berlin, Paris, Svisujo kaj fine en pluraj urboj de Nederlando.

La ekzemplon de Cseh sekvis multaj talentaj propagandistoj, kiuj kunlaboras kun la Int. Cseh-Instituto de E. El ili kelkaj konstante laboras sur int. kampo. Tiberio Morariu komencis gvidi kursojn en 1923 en Rumanujo kaj poste faris tre multajn kursojn en Svedujo, Danujo, Saksujo, Svisujo kaj Vieno, lastatempe kun sia edzino Lizzie Morariu-Anderson. La estona H. Seppik deŝt 1929 laboras en Svedujo kaj Norvegujo. F. ino Elinjo Pähñ el Estonujo kurs-

gvidadas de 1930 en Svedujo, Francujo, Danujo, Nederlando kaj Hispanujo. Julio Baghy el Budapeŝt gvidis same multajn kursojn en Nederlando, Francujo, Estonujo kaj Latvuj. La hungara d-ro Ottmar Fischer grandskale instruas en Norvegujo kaj la rumana Sig. Pragnano en Nederlando kaj Britujo. La norvega Jens Schjerve en Norvegujo, Francujo kaj Usono gvidis grandajn kursojn. G. Ahlstand laboris en Estonujo. Aliaj fervore laborantaj Cseh-metodaj ĝeinstruistoj estas lastatempe: f-ino L. Zamenhof (Svedujo kaj Francujo), f-ino M. Saxl (Danujo kaj Nederlando), Ajo (Danujo kaj Germanujo), K. Tunón (Estonujo), H. Rikand (Estonujo), H. Fox (Svedujo), A. Siitam (Finlando), J. Fethke (Svedujo); krom tio multaj fervore disvastigas E-n, instruante en siaj hejmlandoj.

Cseh-metodaj kursoj okazis ĝis nun en 28 landoj, inter kiuj ankaŭ en Usono (Schjerve kaj Doneis), en Cinujo (Lilok en Kanton) kaj en Nederlanda Hindujo (D. M. Pot).

Instituto. 24 majo 1930 fondiĝis en Hago la Int. Cseh-Instituto de E. Ĝia celo estas eduki kaj doni bonajn instruistojn al la publiko, kiu deziras lerni E-n en agrabla kaj facila kurso laŭ la metodo de Cseh kaj doni al la instruistoj kaj al la kursaranĝantoj la necesan helpon. La Int. Cseh-Instituto estas sendependa kultura fondajo kun sidejo en Hago (Nederlando) kaj ĝi estas direktata de la fondintoj: Andreo Cseh kaj s-ino Julia Isbrücker. La Int. Konsilantaro de la Instituto konsistas el prof. P. Bovet, Genève, prof. O. Buijwid, Kraków, prof. W. E. Collinson, Liverpool, konsulo K. von Frenckell, Dresden, d-ro Edmond Privat, Genève, Ed. Stettler, Bern, Georges Warnier, Parizo.

La oficejo de la Instituto fiksiĝis en Hago, unue en la hejmo de ges-roj Isbrücker, deŝt la unua de okt. 1933 en propra domo, Riouwstrat 172.

Al la instituto apartenas: Fondantaj membroj; subtenantaj membroj; aktivaj membroj, kiuj kunlaboras kun la Instituto. Ili estas invitataj de la Instituto.

La Instituto arangas en ĉiu jaro int. kursojn kaj seminariojn por tiuj personoj, kiuj deziras poste gvidi Ĉe-metodajn kursojn. Al personoj, kiuj deziras gvidi Ĉe-metodajn kursojn, la Instituto donas specialan rajtigiton kaj disponigas la necesan materialon por la kursoj. La instituto havis en junio de 1933 jam precize 300 rajtigitajn instruistojn en 23 landoj.

La unua int. kurso, kiun aranĝis la Instituto, estis en 1930 en Arnhem. Partoprenis 200 instruistoj el 20 landoj. Rezulte de tio, la urbestro de Arnhem disponigis bienon kun belega domo en 1930 por la kursoj kaj konferencoj de la Cseh-Instituto.

La Esperanto-Domo (Arnhem) entenas kurssalonon por 120 kursanoj, restoracion, konversacian salonon, oficejon kaj hotelĉambrojn por 50 personoj. Krom la ordinara someraj kursoj por komencantoj kaj progresintoj kaj specialaj seminarioj kursoj por Cseh-metodaj instruistoj, la Instituto arangas de tempo al tempo aliajn kunvenojn kaj kursojn, el kiuj ĝis nun la plej gravaj estis: La Universitata Kurso de d-ro Privat kaj la Lingva Konferenco dum Pasko 1932, la Lingva Olimpiado dum Kristnasko 1932 kaj la int. kurso por la personaro de la Poŝto, Telegrafio kaj Telefonio, kie 118 partoprenantoj ĉeestis el 5 landoj en junio 1933. JULIA ISBRÜCKER

Currie (kuri) Walter, skoto, komercisto. Nask. 11 aŭg. 1872 en Ecclefechan. Prez. de Burnley ES de 1908. Ĉiusemajna E artikolo en Burnley Gazette. Instruis E-n en tekniklernejoj de Burnley, Blackburn, Nelson. Trad. anglen La kandeligoj de la episkopo: La pacientoj de la kuracisto; Ĉu li?

Curry (kuri) Arthur Llewelyn (ps. Pelikano, Sondisto), anglo, pastro anglikana. Nask. 6 majo 1870 en Tynemouth. Kunlaboris en la Eklezia Revuo, trad.: Elegio en la Tombejo (Gray), Reĝo Lear (Shakespeare; kunlabore), k. a.

Czitrom (citrom) Tibor, hungaro, privatficisto, E-instruisto. Nask. 7 febr. 1900 en Budapest. E-isto de 1924. Estis prez. de HESL kaj gvidis

multajn kursojn. De 1931 je la invito de SEI gvidas rektmetodajn kursojn en Svedujo. Prop. vojaĝo en Svedujo, Finnlando, Estonujo. Lumbild- kaj radioparoladoj; ankaŭ pri Hungarujo. Aŭtoro (kun d-ro Szilágyi) de la lumbilda E-kurso.

Czubrinsky (ĉubrinski) Antoni, polo, d-ro, gimnazia instruisto. Nask. 31 jan. 1885 en Kraków. Verkis multajn prop. kaj statistikajn artikolojn pri E, havis paroladojn kaj publikigis longan pollingvan verkon pri E. Inicijatinto de P' ideo pri »interŝtata E-akordo« kaj pri ĝenerala plebiscito por E inter ne E-istoj. L. K.

CAE: Ĉeĥoslovaka Asocio E-ista, v. Ĉeĥoslovakujo.

Čače Ints, latvo, kompostisto. Nask. 23 apr. 1895. E-isto de 1911. Kursgvidanto, precipe inter blinduloj kaj junularo. Verkis lerno-libron kaj trad. tragedion el latva lingvo. J. Rainis — Amo estas pli forta ol morto, 1933.

Če Andreo, v. Cseh.

Čeřeč, ps. de H. F. Höveler, v.

Ĉeĥoslovakujo. La unua ĉeĥlingva lerno-libro aperis en 1890. Eldonis ĝin je propra risko kaj per propra mono laboristo Fr. Val. Lorenz, kiu presigis ĝin ĉe Fr. Hoblík en Pardubice. La broŝuro kaŭzis preskaŭ nenian resonon. La aŭtoro, konvinkita socialisto, baldaŭ poste estis suspektata de tiama aŭstruja polico, ke li partoprenas en nacie kaj socie revolucia konspiro kaj li elmigris Brazilon.

En 1900 eldonis juna instruisto Theodor Čejka en negranda urbo Bystrice p. Host. detalan ĉeĥan lerno-libron (188 p.; kunverkintoj: V. Bilík kaj J. Holub.). Čejka trovis eminentan kunlaboranton en sia kolego Josef Krumpholtz, kiu helpis lin ĉe novaj eldonoj de la lernolibro. Ambaŭ aŭtoroj daŭre plibonigadis sian verkon. Čejka sciis organizi presadon kaj vendadon de lernolibroj kaj vortaroj diversampleksaj kaj donis tiamaniere al unuaj propagandantoj tre bonajn ilojn. Fina eldono de lia detala lernolibro estis la kvara aperinta 1908. En la sama jaro aperis ankaŭ detala Vortaro E-ĉeĥa de Čejka. (170 p.)

En nov. 1902 komencis Čejka el-

doni tri gazetojn: Revuo internacia estis destinita por tutmonda e-ista publiko. Ĝia ĉefa kunlaboranto estis Ivan Seleznyov, kiu tiam vojaĝis tra la mondo kaj haltis en ĉefaj landoj. La revuo havis du »aldonojn« aparte aboneblajn: Bohema e-isto por propagandi inter ĉeĥoj, kaj Germana e-isto inter germanoj. De la Revuo int. aperis kvin numeroj bele presitaj kaj kun rimarkinda enhavo. De la Bohema e-isto unua jarkolekto kaj de la dua 9 n-roj, de la Germana e-isto 5 n-roj.

Organizo de la movado komenciĝis en 1901, kiam estis en Brno (Brünn) fondita la unua klubo nomita: »Unua societo de aŭstriaĵ e-istoj«. Fondis kaj gvidis ĝin tipografo J. Kajs kaj ĵurnalisto Karel Pelant. Tiu ĉi verkis (laŭ Einstein) kaj eldonis la unuan prop. kaj informan broŝuron. En la sama jaro komencis en Praha dekok-jaraj junuloj Eduard Kühnl, studento de alta teknika lernejo, kaj Fr. Barth, komerca oficisto, kolekti interesantojn pri E kaj publikigi artikolojn en ĵurnaloj duarangaj. Kolektintaj areton da adresoj la du pioniroj fondis E-istan klubon en Praha, fonda kunveno okazis 9 dec. 1902, ĉeestis 15 personoj, el kiuj restis aktivuloj por plua tempo sole tri: Barth, Stan. Kamaryt, Kühnl. Prez. fariĝis librovendisto Ed. Weinfurter, al kiu imponis la nombro de la ĉefaj lernolibroj venditaj en lia butikoj. Sed li ne sciis organizi la novan klubon por interna funkciado kaj ekstera laborado. Tion faris nur Vojtěch Kraus, dua prez. de la klubo, elektita 17 jun. 1903. Sekr. de la klubo estis komence Kühnl kaj post li Kamaryt. Sekvis prelegoj kaj kursoj.

La unuan publikan prelegon havis en tiam tre laŭmoda »Virina klubo« univ. studento Kamaryt en 1904. En 1901—1904 ekatakis kelkaj propagandantoj la publikan opinionon per gazetaj artikoloj. En tiu sfero plej aktivaj estis tiam studento de alta teknika lernejo H. K. Bouška en Praha, kaj instruisto J. Svačina. en Ĉ. Budejovice. La klubo en Praha fariĝis ankaŭ baldaŭ centro de tendencoj organizi la movadon inter ĉeĥoj.

Laŭ iniciato de Kühnl ĝi decidis edonadi novan ĉeĥa—E-an gazeton kaj fondi nacian centran societon.

La fondo de nova gazeto kaj proponata organiza principo trovis kontraŭstaron de amikoj de Ĉejka kaj de Bohema E-isto, pro kio naskiĝis malpacoj kaj fine rompo inter ĉ. E-istoj rezultinta en fondo de du naciaj centroj (»Unio« de lokaj kluboj kaj »Asocio« de individuoj) kaj eldonado de du prop. gazetoj. En jan. 1907 eldonis Kühnl la unuan n-ron de »Oficiala organo de bohemiaj E-istoj Časopis českých esperantistů«. Tiu ĉi ĉeĥa—E-a monata revuo aperadis sub redakto de la eldonanto ĝis la mondmilito. Kaj en okt. 1908 komencis Kamaryt kaj Bouška eldoni monatan revuon por prop. de E inter ĉeĥoj »Bohema E-isto, Český esperantista« (daŭrigo de la revuo de Ĉejka). Sub nova gvido aperis kvar jarkolektoj, la lasta (sesa) en 1912. En 1908 estis fonditaj du konkurencaj naciaj socioj: »Bohema Unio E-ista« kaj »Bohema Asocio E-ista«. La Unio elektis kiel prez. prof. Dr. Václav Rosický, kiel oficialan organon la gazeton de Kühnl. La gvidantaj personoj en ĝi estis Kühnl kaj Karel Procházka. La gvidantoj de la Asocio estis Bouška, Kamaryt, Dr. Josef Barvir kaj financa oficisto Mil. Schmidt. Ambaŭ naciaj centroj akre konkurencis ne unusole en varbado de membroj sed ankaŭ per prop. faroj.

Tial estis E-ista vivo inter ĉeĥoj tre vigla. Oni eldonis prop-ilojn, lernolibrojn, vortarojn, literaturajojn. La plej gravaj estis: Detala lernolibro de Kühnl, ĉeĥa—E-a vortaro de Kühnl—Procházka, broŝuro »Slovakoj kaj Magiaroj« de Bouška, kolekto de ĉefaj »informaj flugfolioj«, ĉ. traduko de la traktato de Unuel »Esenco...«, »Rakontoj« de Arbes, tradukitaj de Josef Grna, ĉ. eldono de la »Fundamento« de Kühnl ktp. Da lernolibroj por ĉeĥoj aperis antaŭ la milito 14.

Por slovakoj eldonis kiel lernolibron slovakon tradukon de la »Fundamento« d-ro Albert Škarvan helpata de rusa E-isto Evstifejev. La libro aperis en Turčiansky Sv. Mar-

tin en 1907. (Dua eldono 1918 en Chicago.) Aperis en tiamaj slovakaj gazetoj kelkaj artikoloj, sed pli ofte nefavoraj.

Germanoj kaj hungaroj loĝantaj en la landoj nun ĉeĥoslovakiaj partoprenis tiam la movadon pere de sialingvaj grupoj kaj asocioj, tial oni raportas pri ilia agado sub aliaj titoloj. En nuna ĉefurbo de Slovakujo Bratislava (Pozsony, Pressburg) estis fondita loka E-ista grupo de István Nagy - Molnár kaj Emil Wanišek. La grupo funkcias ĝis nun kaj estas daŭre gvidata de la dua de la fondintoj. El sukcesoj de la germanoj estas menciinda starigo de la E-monumento (la unua en la mondo) en bohemia banloko Františkovy Lázně (Franzensbad). Propagandis ĝian konstruon kaj kolektis monon por ĝi UEA-del. kaj prez. de la loka grupo Jakob Hechtl, bavara fervojfiscisto. La monumento estis solene inaŭgurita dum la IV-a Aŭstruja E-kongreso pentekoston 1914.

Jam en antaŭmilita periodo oni propagandis en fakaj medioj. Kun sukceso estis inter ĉeĥoj prilaborataj jenaj tri fakoj:

Virinoj. Jam en 1904 estis fondita »Unua virina klubo E-ista« en Praha. Ĝia gvidantino estis Matylda Krausová, edzino de Vojtech Kraus. Ŝi aktive kunlaboris en multaj aliaj E-istaj entreprenoj. Gravan apogon ricevis la movado per persista agado de Julie Šupichová, instruistino, kiu veninte 1911 en Praha baldaŭ fondis novan »Rondeton de E-istinoj«, kiu fariĝis tre potenca fokuso, en kiu kuniĝadis kaj el kiu eliradis iniciatoj por laboro inter virinoj.

Blinduloj. Baldaŭ post fondo de la Klubo en Praha kelkaj ĝiaj membroj komencis kontakton kun blinda instruisto en la Blindula Instituto Klár, K. Em. Macan, muzika komponisto sufiĉe ŝatata. Li fariĝis konvinkita E-isto kaj lia kunlaborado kun E-istoj vidantaj havis rezultojn utilajn por la movado same kiom por blinduloj. Jam en 1904 li aranĝis helpata de Kühnl kaj V. Riegel kurson por flegatoj de la Instituto Klár. Depost tiu tempo restis la

E-kursoj daŭra arango en tiu Instituto. Nombro de ĉ. blindaj E-istoj kreskis tiom rapide, ke en 1922 estis fondita »Societo de ĉeĥoslovakaj nevidantaj E-istoj«. (SOČNE) Jam pli frue (1920) eldonadis societo »Ĉeĥa blindula presao« kiel aldonon al sia reliefe presita gazeto monatan E-an gazeteton Aŭroro. SOČNE eldonis en reliefe blindula skribo ampleksajn verkojn (lernolibrojn, vortarojn ktp). El la vidantaj E-istoj kunlaboris kiel gvidanto prof. Stan. Stejskal helpata de f-ino Božena Vlčeková, post lia morto 1929 Vuk Echterner.

Laboristoj. En 1911 fondis juna fervojfiscisto Fr. J. Chaloupecky »Laboristan unuigon E-istan«, kiel fakon de socialdemokrata kleriga asocio »Laborista akademio«. En 1912 komencis Chaloupecky eldoni ĉeĥan prop. gazeton La kulturo. La nova gazeto, kiu senkaŝe turnis sin al laboristoj konsiantaj pri sia aparteno al la batalanta klaso, trovis rimarkindan resonon. Sed Chaloupecky post neplena jaro transiris al ldo. »La kulturo« restis fidela al E kaj daŭrigis sian ekzistadon sub redakto de Robert Šáda kaj Josef Šidlo. Kelkan tempon redaktis ĝin ankaŭ R. Fridrich. Ĝi aperadis ĝis la mondmilito. Ankaŭ fundamentoj metitaj per laborado en tiu ĉi sfero montrigis solidaj. Post milito tuj ekstaris en Ĉ. diversaj laboristaj E-grupoj, kiuj jam en 1920 kuniĝis en »Laborista Ligo E-ista en Ĉ.« precipe sub gvido de J. Pechel Plzen. Ĝi funkcias ĝis nun kontentige kaj eldonas por informo de siaj membroj ciklostilitan Bultenon de L. L. E. (en 1933 sesa jarkolekto); en 1933 eldonis ĉeĥan tradukon de broŝuro de Lanti. Inter laboristoj—E-istoj daŭras disputoj pri la socialismaj kaj nacismaj vidmanieroj. En 1932 estis fondita konkurenca nova »Ĉeĥoslovaka Laborista Asocio E-ista« en Ŭstí n. L. (Aussig). (Membro de ISE).

La ĉeĥaj E-istoj klopodis jam frue akiri aprobojn de ĉeĥaj eminentuloj aŭ montri taŭgecon de E por propagandi la nacian politikajn idealojn en fremdlando. Ŭni sukcesis ricevi de kelkaj univ. profesoroj subskribojn sub deklaron de la Delegacio por

akcepto de int. lingvo kaj aprobajn deklarojn de kelkaj eminentuloj por E. El ili la plej grava estis artikolo verkita de la ĉeĥa filozofo Fr. Krejčí (Bohema E-isto, 1908). Tre grava sukceso estis kontakto kun »Nacia konsilantaro ĉeĥa«, komitato, kiu volis esti kaj ofte estis rigardata kiel la plej alta aŭtoritato en naciaj problemoj. Ĝi eldonis en 1911 E-lingvan broŝuron pri »Popolsumigo en Aŭstrio« (de J. Hantich, trad. Rud. Hromada). E-ista Klubo Praha en 1906 dum preparado de Aŭstria ekspozicio en London kunlaboris sukcese kun la ĉeĥa fako kaj ricevis pro tiu laboro honoran diplomon. Pri sokola kongreso en 1912 estis eldonita E-lingva propagandilo, kiu elvokis vigan korespondadon. Deklaro por E de londona urbestro Sir Vezey Strong apogis menciinde situacion de la movado dum lia vizito en Praha 1911. Komitato de la granda »jubilea« ekspozicio en Praha 1908 eldonis E-lingvan prospekton, kiu kaŭzis, ke venis tiam al Praha 214 fremduloj—E-istoj. Specialan atenton pri prop. taŭgeco de E kaŭzis ne sole en ĉeĥaj landoj sed ankaŭ en la tuta Eŭropo la per-E-a paroladvojaĝo de d-ro Aug. Pitlik, kiu, kiel unua Eŭropano, la 17. XII. 1912 ekvojaĝis el Praha por E-e kaj lumilde propagandi la kulturajn, historiajn, kaj naturajn memorindaĵojn de sia patrujo. Ĝis la 30. V. 1913 estis aranĝitaj entute 33 paroladoj en 32 urboj de 11 eŭropaj ŝtatoj. La paroladoj estis tradukitaj en 10 lingvojn naciajn.

La eksplodo de la mondmilito haltigis inter ĉeĥoj preskaŭ komplete la movadon, kiu estis tiom vivanta. El la societoj vivetis sole Rondeto de E-istinoj kun Šupichová. La popola revuo Rozkvet publikigadis ŝian kurson de E, el kiu rezultis ampleksa korespondado de la aŭtorino, kun legantoj de la kurso precipe el milita kampo. Nur en fino de 1917 komencis Kamaryt provojn revivigi la Boheman Asocion E-istan. Kiam en fino 1917 la polica premo ĉesadis, komencis movetiĝi ankaŭ E-istoj. En Plzen proponis B. Titl kaj Fr. Kavan eldoni prop. gazeton kaj ricevinte aprobon de kelkaj E-istoj en Praha ili

eldonis kun E-ista klubo en Plzen kiel eldonanto en marto 1918 la unuan n-ron de La Progreso, »monata organo bohema«. La gazeto aperas ĝis nun.

Ankaŭ en komenco 1918 kunvenis en Praha reprezentantoj de ambaŭ tiamaj naciaj societoj Unio kaj Asocio kaj decidis kunfandi la du societojn tuj, kiam post la milito estiĝos nova ĉeĥoslovaka ŝtato. La esperoj plenumiĝis kaj la du societoj kunfandiĝis en 1920, kiam la 1-an de feb. 1920 estis oficiale fondita Ĉeĥoslovaka Asocio E-ista. Prez. estis elektita registara konsiliisto Josef Eiselt, vicprez. Kamaryt (en Bratislava), ĝenerala sekr. Rudolf Hromada. Partoprenis la laborojn de la Asocio precipe sindone komitatanoj el diversaj jaroj: Bouška, O. Ginz, Josef Friedrich, R. Herzigová, Kraus, Pitlik, O. Sklenčka, Stanek, Fr. Slavik, Jar. Šustr, A. Tarantík. a. CAE daŭre tenis gvidan lokon en organizado de la movado. Baraktado kontraŭ senintereso kaj inertece eĉ kontraŭ ia speco de ĵaluzo de la lokaj grupoj postulis multan paciencon kaj persistemon. Oni provis diversan aranĝon de la kotizoj. De la komence postulataj 2 Kč po membro de la loka grupo oni venis en 1933 al 16 Kč po membro individua kaj 10 Kč po ano de la grupo aliĝinta korporacie. En 1933 pagis kotizojn (po 16 Kč) 505 membroj. Tamen la gvidantaj personoj sciis kolekti tiom da rimedoj, ke la Asocio povis disvolvi agadon tre ampleksan kaj akiri rezultojn en tre diversaj sferoj. La administron multe malhelpas nepersisto de anoj. En fino de 1931 estis sole 36 membroj, kiuj pagis kotizon seninterrompe deponit la fondo.

»La Progreso« ankaŭ post fondo de la Asocio aperadis en Plzen sub redakto de Titl. En 1921 komencis komercisto O. Adámek en Praha eldoni kaj Bouška redakti monatan gazeton en ĵurnala formato Ĉeĥoslovaka gazeto kun aldono Nova Eŭropo. Tiu ĉi intencis esti »E-a tribuno de malgrandaj nacioj«. La gazeto aperadis ĝis komenco de 1923, sume 14 n-roj. En sept. 1920 komencis Šupichová eldoni ĉefling-

van prop. monatan revueton *Esperantistky zprávy* (E-a raportanto por ĉefoj), kiu aperadis dum 3 jaroj ĝis dec. 1923. Ambaŭ gazetoj publikigadis informojn pri la Asocio varbante por ĝi inter la legantaro same kiel »La Progreso«. Sed en 1923 ankaŭ tiu ĉi gazeto jam tre suferis pro financaj mankoj. De ĝia sesa jarkolekto aperis sole 6 n-roj. Tiam post sensukcesa propono de la ĝistiam eldonanto al ĈAE Hromada helpata finance de kelkaj amikoj transprenis ĝian eldonadon. La Progreso fariĝis oficiala organo de ĈAE. La unua n-ro sub redakto de Hromada aperis en nov. 1923 en Praha. En jan. 1925 komencis ĈAE eldoni sian *Bultenon* en *La Progreso*. Tio daŭris ĝis marto 1933, kiam estis decidite eldonadi la *Bultenon* sendepende de *La Progreso* kaj sendadi ĝin senpage al la membroj. Hromada estis ĝenerala sekr. ĝis 1931. Dum diversaj jaroj multe helpadis lin O. Ginz, kiu estis poste ĝen. sekr. dec. 1931—marto 1932. Post li estis tiu funkcio dividita; oficialan parton transprenis *Sustr*, administran *Slavik*. Post *Eiselt* fariĝis en 1930 prez. *Kamaryt*. Kasisto estis ĝis 1927 *Fr. Novák*, post li estis la funkcio tenata kvazaŭ provizore, nur en 1930 akceptis ĝin *Sklenčka*.

La germanoj en Bohemujo kunigis en 1913 la grupojn en »Landa asocio de germanaj E-societoj en Bohemio«. Post la milito oni ŝanĝis (1920) la titolon laŭ la nova stato: »Ligo de germanaj E-societoj en Ĉ.« En 1924 estis reorganizita la tuta movado inter la germanoj en Ĉ. La reorganizita societo »Germana E-Ligo en Ĉ.« konsistas sole el individuaj membroj. Ĝia unua prez. kaj reorganizinto de la postmilita movado estas ĝis nun inĝ. *Gustav Scholze*, prof. de germanlingva supera industria lernejo en *Liberec* (*Reichenberg*). Krom li funkciis kiel dua kaj tria prezidantoj d-ro *Josef Fischer*, prof. en *Weidenau*, *Franz Ulbert*, poŝtdirektoro en *Karlovy Vary* (*Karlsbad*), *Josef Süßner*, prof. en *Zatec* (*Saaz*), *Rudolf Fenzl*, fervojisto en *Plzen*, *Heinrich Müller*, direktoro en *Ústí n. L.* (*Aussig*), *Franz Benisch*,

direktoro en *Moravská Ostrava*, *Rudolf Horn*, ŝparkasa direktoro en *Krnov* (*Jägerndorf*), *Hans Klinger*, supera dogana oficisto en *Podmokly* (*Bodenbach*). Sekretarioj estis *Karl Schüller*, *Fritz Michalek*, *Rud. Rössl*, f-ino *M. Kirsten*; kasisino f-ino *M. König*.

Krom la nomitaj funkcioj estas menciindaj: Prof. d-ro *Lederer*, eldoninto de la »*Bela mondo*«, d-ro *Bischitzky*, nestoro de la ĉefurbaj germanaj E-istoj, ekzamenanto pri E ĉe la ŝtata germanlingva Ekzamena Komisiono por burĝaj kaj popoloj lernejoj en Praha. Tre vigla pioniro antaŭ milito estis inĝ. *Julius Boschan*, kiu multe laboris por starigo de la landa ligo antaŭmilita. Fervorega disvastiganto de E inter germanoj nordbohemiaj estis *Julius Patzelt*, fondinto de multaj grupoj. Kiel oficialan organon GEL prenis monatan gazeton *Marto*, kiu komencis aperi en 1912 en *Graz* (*Aŭstrujo*), ĉesis aperi dum milito kaj en 1920 estis renovigita de instruisto *J. Taubmann* en *Bor* (*Haida*). La gazeto estas plene en E, la kovrilo surhavas *Bultenon* de GEL, germanlingvan. Depost 1924 ĉiuj lokaj kluboj estas likviditaj kaj funkcias kiel grupoj de GEL-anoj. Ĉiu membro pagas per unusola kotizo (26.50 Kč) kotizojn grupan, distriktan, ligan kaj abonon de la Liga organo. En 1932 GEL havis 395 membrojn. De apr. 1934 *Marto* ĉesis aperi kaj GEL eldonas sian *Bultenon* memstaran senpage por la membroj.

Ambaŭ naciaj societoj estas daŭre en amikaj rilatoj. ĈAE turnas sin krom al ĉefoj kaj slovakoj ankaŭ al hungaroj, poloj, rutenoj, GEL al germanoj. Tiu divido de la agadsfero praktikata de komenco estis proklamita per komuna rezolucio en 1926 dum la 3-a nacia kongreso en Bratislava.

Ambaŭ naciaj societoj ĉiam rigardis grava, ke nombro de UEA-anoj en la lando estu kiom eble plej granda. Kiam en 1923 *Otto Sklenčka*, banka librotenisto en *Hradec Králové*, akceptis funkcion de ĉefdelegito, komenciĝis grava kresko de nombro de UEA-anoj. La plej

granda ĝi estis en 1928: 1361. En 1932: 1194. En tiu ĉi jaro neniu lando superis Ĉ. koncerne la nombron. Eĉ Germanujo, kiu ĝin superis en 1928 je 42 anoj, havis en 1932 sole 1185. Vicĉefeld estas Joh. Klingger en Podmokly (Bodenbach), helpanto Herold Kesik en Bratislava. Kunlaboro inter Teritoria oficejo kaj la ambaŭ naciaj societoj estis daŭre bonega, Sklenĉka estis preskaŭ seninterrompe komitatano de ĈAE, de post 1930 li estas eĉ ĝia kasisto. Same Klinger en GEL. Por esti en kontakto kun delegitoj komencis Sklenĉka eldoni laŭbezone aperantan gazeton Teritoria tribuno, kiu estas kolekto de administraj kaj aliaj dokumentoj rilatantaj funkciadon de UEA. Unua n-ro aperis 1. XI. 1925, la dekunua 30. XI. 1932.

Ĉiuj tri institucioj (ĈAE, GEL, Teritoria UEA-oficejo) laboris daŭre en harmonia interkonsento. Ĉiuj iom gravaj entreprenoj estis faritaj almenaŭ dum reciproka scio. Al iliaj iniciatoj kaj laborpovo oni ŝuldas preskaŭ ĉiujn iom gravajn rezultojn akiritajn por la movado en Ĉ. Tamen estas menciindaj ankaŭ diversaj entreprenoj de unuopuloj, kiuj laboris apud tiuj ĉi tri organizoj:

Ĉeĥoslovaka E Instituto en Praha fondita laŭ iniciato de Pitlik 27. jun. 1923 kaj konstituiginta 11. nov. 1923 prilaboras precipe la instruon (kursoj) kaj prelegan flankojn de la propagando. Ĝi posedas »Privatan lernejon por E« laŭ permeso de lerneja ministerio (n-ro 131.488, 7. XII. 1923) kaj rajtas aranĝi ekzamenojn kaj doni atestojn pri scio de E. La lernejo estas dua tiaspeca en Ĉ. La unuan fondis en 1922 prof. Süsner en Zatec (Saaz). La instituto eldonis (en 1926) 4-an eldonon de ĉeĥa ŝlosilo.

Julie Šupichová, faka instruistino en Praha, verkis plurajn lernolibrojn kaj sukcesis eldonigi ilin ĉe diversaj eldonistoj. Ŝi daŭre sendas artikolojn pri E al diversaj gazetoj kaj sukcese klopodas per E-rubrikoj precipe en porinfanaj gazetoj.

Moraviaj E-Pioniroj en Olomouc estas unuiĝo de tri viroj: Jar. Mastný, fabrikisto, Ant. Ku-

dela, juĝa oficsito, Albin Neuzil, lernejestro, kiuj fondis specon de privata eldona entrepreno jam antaŭ milito. Sed nur en Ĉ. ili eldonis vicon de libroj tre prudente elektitaj: Mahen: Kboldo Ondra; Čapek: RUR; Rebiček: Int. konvencioj fervojaj; Herben: Malriĉa knabo, kiu gloriĝis; Welzl: Tridek jarojn en la ora nordo; Herman: Fokso-Nukso; Vlado: Mi en li; Kamaryt: Filozofia vortaro.

Inĝ. Leopold Berger en Poštjejn eldonas depost 1919 Adresaron de E-istoj uzante por sia eldonejo indikon Bohema E-Servo. En 1932 aperis 10-a eldono de tiu BES-a Adresaro. Krom tio li eldonas diversajn gazetojn kaj librojn. Kunlaborinte kelkajn jarojn en ĈAE li en 1929—30 akre atakis kontraŭ ĝiaj gvidantoj precipe kontraŭ Hromada kulpigante la Asocion pri germanemo.

Pitlik eldonadis en 1928 dum pluraj monatoj Ĉeĥoslovakana E-Preŝon sendatan i. a. ankaŭ al redakcioj por represado de informoj pri E.

Robert Bloch depost 1931 vendas diversajn E-ajojn, donas informojn turismajn kaj afable prizorgas diversajn aferojn de E-istoj sub kvazaŭ komerca firmo Neŭtrala E-centro en Praha. Pro tiu ĉi erariga titolo riproĉas lin oficialaj organizoj.

En Prostejov komenciĝis en aŭg. 1930 aperadi ciklostilita prop. gazeto Ligilo. Depost tria jarkolekto aperas presite, tre regule, sub redakto de Fr. Heikenwälder.

Komercaj eldonejoj starantaj ekster la organizo eldonis krom la lernolibroj de Šupichová ankoraŭ: E-lernejon de Bouška, lernolibrojn de Zdářský, Eiselt, vortarojn de Čánsky-Riedl, Hromada-Petr, Filip, Kilian gvidlibron »Moravia karsto« de Barvir, k. a. — Josef Bednár, posedanto de privata komerca lernejo en Brno, eldonis 1925 sian lernolibron kaj en 1926 krestomatieton »Barono mensogbabilulo«. — Hromada eldonis ĉe Progreso lernolibron de Silha (1926).

Ĝenerala propagando, precipe la individua varbado, estas plejparte farata de la lokaj kluboj, da

kiuj ekzistas ĉirkaŭ 70. Estas citindaj krom la menciitaj: Košice (Kassa), kiu fidele partoprenas en la centra organizo, Bratislava kun sia biblioteko de 400 vol., Plzen eldonadis dum ses jaroj La Progreson, Rondeto de E-istinoj eldonis ĉeĥan broŝuron de Šupichová »Konsilanto al la ĉ. E-isto«, Ústí n. Orl. aperigis ĉ. broŝuron pri la Komerca konferenco en Venezia. Estas kompreneble, ke la E-ista klubo en Praha liveras al ĈAE grandan nombron de membroj kaj apogas la centron diversmaniere. Ĝia biblioteko havas 1350 volumojn. La centroj helpas al ĝenerala propagando precipe liverante la necesajn ilojn. Estis eldonita flugfolio ĉeĥlingva »E-lingva ligilo« aperinta en 1932 en 7-a eldono, en suma nombro da 50.000 e-roj uzitaj dum 12 jaroj, slovaklingva flugfolio, germanlingva varba broŝuro (GEL) ktp. ĈAE eldonis ĉ. tradukojn de broŝuroj »Ligo de nacioj kaj E«, »E kaj ĝiaj kritikantoj« de Collinson. En 1926 ĉirkaŭ unu mil personoj lernis E-n en 50 kursoj ĉeĥoslovakaj en 37 lokoj. Prop. kunvenojn por pli vastaj teritorioj organizas Regiona Ligo E-ista en Ĉ. Tešín, fond. en 1931 por Ostrava-regiono, (prez. L. Krysta, sekr. J. Hladky) kaj Amika Rondaro E-ista en Teplice-Šanov (Teplitz-Schönaŭ), fond. en 1933 por Norda Bohemujo (prez. M. Murath, sekr. L. Krisl).

Por publika manifesto estis uzitaj naciaj kongresoj okazintaj en Brno (1922), Liberec (1924), Bratislava (1926), Teplice (1928), Olomouc (1932). Dum la lasta estis plantita memorarbo apud memorŝtono. La plej granda tiaspeca manifesto estis la 13-a UK en Praha (1921) kun 2663 vizitintoj el 42 landoj.

Gazetaro propaganda estas organizata depost 1921 kaj gvidata preskaŭ sen interrompo de O. Ginz. Oni redaktas taŭgajn artikolojn pri okazintaĵoj de la movado kaj aro de kunlaborantoj dissendas ilin al diversaj redakcioj. La centro liveras materialon al la ĉefurbaj redakcioj ĉiusemajne, krome regule ankaŭ al redakcioj, kiujn ne prizorgas la kunlaborantoj. En centro oni kalkulas ĉiujn aperintajn artikolojn, kiuj iel aludas E-n aŭ int. lingvon ĝenerale.

La rezulto varias en diversaj jaroj. Tamen oni povas nomi kiel fidindan mezon po mil artikoloj en gazetoj ĉeĥoslovakaj kaj duonmilo en germanaj en unu jaro.

Propagando laŭ fakoj kaj profesioj krom la tri medioj tuŝitaj en historio antaŭmilita povas montri registrindajn rezultojn en sekvantaj medioj: Turismo. Temis precipe pri uzo de E por varba literaturo. Aperis gvidfolioj pri Bratislava, Brno, Dobšina, Horice v Podkr., Hradec Králové, Jaroměř, Karlsbad, Lázně Bělohrad (2 eldonoj), Piešťany, Olomouc, Praha (3 eldonoj), Tatro. Reklamaj prospektoj pri Ekspozicio en Brno 1928, Tutsokola kongreso 1932. Pli ampleksaj gvidlibroj aperis pri »Moravia karsto«, »Schönhegst«, »La bohemiaj mondbanlokoj kaj iliaj ekskursteritorioj«. Ĉiuj tiuj publikajoj estis eldonitaj per mono de turistaj korporacioj duonoficialaj aŭ pro ŝtata subvencio aŭ por ilia graveco. La fervoja ministerio eldonis en E du varbajn prospektojn por vizito al la Respubliko, serion de ilustritaj kartoj pri ĉ. kasteloj, luksan gvidlibron pri montaro Tatra (Vysoké Tatry), ĉeĥan-e-an broŝuron pri montaro Krkonoše (Riesengebirge), Ilustritan gvidlibron pri ĉ. fervojlinioj. En Lázně Bělohrad estis en 1931 unua Int. libertempejo organizita de UEA-ĉefdel. Sklenčka; en jul.—aŭg. partoprenis ĝin 39 p. el 8 landoj. Por 1933 ĝi estis organizata duan fojon de la loka grupo. — En 1932 ricevis ĈAE de la komerca ministerio subvencio da 5000 Kč por celo de turisma propagando por Ĉ. en fremdlando.

Radio. Kursoj estis disaŭdigataj el stacioj Brno (Bednár, 1927), Praha (Eiselt, 1928), Bratislava (Wanitssek, 1930), Brno (Kilián, 1932). E-lingvaj prelegoj de Pitlik pri turismaj kaj kulturaj allogaĵoj de Ĉ. estis disaŭdigataj el stacio de Praha jam en 1923, tuj post ĝia fonda; ili estis inter la unuaj E-disaŭdigoj en la mondo. Ĉiuj ĉ. sendstacioj disaŭdigas neregule sed daŭre diverstemajn prelegojn en E. En 1932/3 plej ofte Brno (Kilián, Střežeková, Šamlá) kaj Bratislava (Jukl). La poŝta ministerio informis per dekreto n-ro 66.850-XI-

31 (26. okt. 1931), ke uzo de E por mallongonda sendado estas permesita. Komisionon pri Radio-aferoj ĉe ĈAE gvidas Ĝinz. Faka firmo »Radio-konstrukce« eldonis en 1927 lian »Radio-amatora vortaro kvinlingva«.

Literaturo. Int. reputacion akiris Stan. Schulhof pro originalaj poemoj kaj Miloš Lukáš kaj R. Hromada pro versaj tradukoj. En 1921 aperis »Ĉeĥa literaturo laŭ la birdperspektivo« de Arne Novák tradukita de inĝ. V. Krouzil, prof. de supera industria lernejo en Brno. Tradukoj el la ĉ. literaturo aperadis relative ofte en diversaj gazetoj sen ia organizo kaj estis preskaŭ nenie kolektitaj. En 1932. aperis ĉeĥoslovaka numero de Literaturo Mondo, kromajn v. en sama ĉapitro, sub titolo Moraviaj E-Pioniroj.

Instruistoj. Tiu ĉi medio estis prilaborata plej sisteme, precipe de Kamaryt, Neuzil, Šupichová. Ĉe »Centra societo de ĉ. profesoroj« unuiganta preskaŭ ĉiujn ĉ. profesorojn de duagrada lernejoj estis en 1921 fondita E-a sekcio kun ĉirkaŭ 40 membroj. Prezidis ĝin direktoro de gimnazio en Brno Rudolf Fridrich, sekr. estis Kamaryt. Nuna prez. estas Vlado Jukl, prof. de Komerca akademio en Bratislava, sekr. J. Havráněk, prof. de gimnazio en Uherský Brod. Post pedagogia konferenco ĝeneva en 1922 eldonigis ĈAE ĉ. trad. ukon de la manifesto al gravaj instruistaj kaj profesoriaj gazetoj en suma nombro da 25.000 e-roj. La konferenco Paco per lernejo en Praha 1927 elvokis ĝeneralan intereson pri E inter pedagogoj.

Lernejoj. Oficiala instruado kiel nedeviga fako estas aranĝita jene: En burĝaj lernejoj oni povas instrui post speciala permeso, kiun donas post propono de la direktoro por ĉiu individua kazo lerneja ministerio. En gimnazioj kaj realaj lernejoj estas permesite instrui E-n kiel nedevigan fakon per ministeria dekreto n-ro 5545 de 27. III. 1921. En »Provizora instruplano por komercaj akademioj« (ministeria dekreto n-ro 34.000 de 7. V. 1921) estas E inter pluraj nedevigaj fakoj, en la definitiva instruplano (n-ro 49.448 el 5. V. 1931) ĝi estis

ellasita. En Industriaj lernejoj estis donita permeso instrui E-n en maloftaj kazoj unuopaj, en aliaj unuopaj kazoj la permeso estis rifuzita. Ankaŭ al popolaj lernejoj estis en nemultaj kazoj donita permeso instrui E-n. Tiuj ĉi eblecoj instrui estas uzataj ĉiun jaron en 2—10 lernejoj. En oficiala gvidilo por instruistoj pri civitana eduko en popolaj kaj burĝaj lernejoj estas E kaj E-movado rekomenditaj kiel ekzemploj por montri aplikon de int. solidareco kaj kunlaboro (minist. dekr. 44.457 de 11. IV. 1923). Ĉe la ĉeĥa teknika altlernejo en Praha estas starigita lektorato de E depost 1922 (minist. dekr. 115.445 de 13. XII. 1922), lektoro estas d-ro Pitlik, ĉe la germana teknika altlernejo en Praha (min. dekr. 33.652 de 6. III. 1929) estas lektoro d-ro Emil Michal. Ĉe 3 ĉeĥoslovakaj, 2 germanaj kaj 1 hungara Ekzamenaj komisionoj por popolaj kaj burĝaj lernejoj estas de ministerio nomitaj ekzamenaj komisaraj por E kiel nedeviga fako por burĝaj lernejoj. Du ĉeĥaj kaj du germanaj lernolibroj estis oficiale aprobitaj de lerneja ministerio por uzo en lernejoj. ĈAE ricevis en 1925 subvencio da 1000 Kč de la lerneja ministerio por popolklerigaj celoj.

Katolikoj. En 1923 estis fondita unua loka unuigo en Praha, en 1929 tutŝtata Ligo de Katolikaj E-istoj en Ĉ. kun celo propagandi inter katolikoj kaj subteni la movadon por reunuigo de eklezioj. En 1932 ĝi havis 190 anojn. Prez. estas help episkopo d-ro Ant. Eltschknér, ĉefa gvidanto Fr. Bühr. La Ligo laboras tre vige kaj sukcese en sia medio, relative oftaj estas ekz. E-lingvaj predikoj en famaj preĝejoj. En 1928 ĝi iniciatis, ke Komitato de miljara jubileo de Sankta Venceslao eldonis en E belan broŝuron pri li (tradukitan de Borivoj Benetka). Depost 1931 ĝi eldonas kvaronjaran presitan Informilon.

STAN. KAMARYT.

Ĉekbanko E-ista fondita 1907 de H. F. Höveler en London. En- kaj elpagoj baziĝis sur E monunujo spesmilo (=2 oraj ŝilingoj). Transpago plej oportuna kaj malkara. 30 apr. 1914 ĝi havis 730 kontulojn en 320 urboj, 43

landoj. Post morto de la fondinto la banko likvidiĝis.

Ceklibroj internaciaj. Eldonis ilin 1908 la E-a konsulejo en Genève. Ĉiu libro enhavis 50 ĉekojn kaj kostis 50 Sp. La nomo de la banko, al kiu la ĉeko estis adresota, ne estis presita sur la ĉekoj, sed devis esti skribita mane, tiamaniere, ke ĉiu E-isto povu uzi tiajn ĉekojn, skribante sur ili la nomon de sia banko. ŜIRJAEV.

Cekoj internaciaj. La int. helpa mon-sistemo decimala, proponita en 1907 de prof. Saussure, estis bone akceptita de la E-istaro, kiu volonte uzis ĝin. La Svisa Bankunio (Schweizerische Bankverein) en 1908 enkondukis int. ĉekojn, kies monvaloroj estis montritaj en spesmiloj, kaj kies teksto estis nur E-a. Samjare la banko Pictet en Genève eldonis similajn ĉekojn ankaŭ kun E-a teksto. ŜIRJAEV.

Ĉejka Teodor, ĉeĥo, instruisto en Bystrice p. H. Nask. en 1878 en B. E-isto de 1900. Verkis kaj eld. la unuajn ĉeĥajn lernolibrojn: la unua aperis en 1900. Samtempe li fondis monatan gazeton redaktitan pure en E: Revuo int. Verkis E-Ĉ vortaron, 1908, 170 p. L. K.

Ĉilo. Komenco en 1901. La unuaj E-istoj estis Luis E. Sepulveda Cuadra kaj katolika pastro E. Fábres. En 1902 Sepulveda faris longan paroladon en Scienca Societo de Ĉilo (aperis ankaŭ en broŝuro) kaj presigis artikolojn en »El Diario Ilustrado«, »El Mercurio«, »El Porvenir«, »El Chileno« k. a. 17 jul. 1903 li fondis la »Societon E-istan de Ĉilo« kaj en sept. komencis redakti kvarpaĝan gazeton en E kaj hispana lingvoj, Ĉilio E-ista, kiu estis dissendata senpage. En 1904 li instruis E-n en la instituto por blinduloj. Poste oni instruis la lingvon en Komerca Instituto de Santiago, en Liceo de Valparaiso. La 8-a Scienca Kongreso, okazinta en 1913, en Santiago, rekomendis al la registaro enkonduki E-n en la programoj de la komercaj, militaj kaj maristaj lernejoj. (Poste okazis ankoraŭ aliaj similaj rekomendoj.) 24 nov. 1907 estis fondita Ĉila E-ista Asocio, kiu grandparte unuigis la E-istaron. En 1910 oni

aranĝis la unuan landan kongreson en Santiago. Malgraŭ ĉiuj penadoj, malgraŭ la penado starigi en 1927 Societon E-istan de Ĉilo kaj 14 marto 1928 la Ĉilan Ligon E-istan, la movado havis malgrandan progreson pro indiferenteco. Lastatempe la movado en la lando denove ekvivis kaj 30 jul. 1932 Sepulveda invitis diversajn junulojn de liceoj kaj oni tondis la societon »E-ista Junularo de Ĉilo«. En sept. Sepulveda fondis per propraj rimedoj en sia loĝdomo E-istan Informojn. SEPULVEDA CUADRA.

Ĉinaj noveloj de Erdberg, elrusigis P. Gavrilov. 1933, 72 p. Tendencia bolŝevika. »Interna, anima kontakto de l' aŭtoro kun la sklavaj amasoj neniel sentiĝas. Lingvaĵo entute bona.« (N. B., S. R. 1933, p. 84.)

Ĉinujo. Jam la granda saĝulo, Konfucio parolis pri la int. lingvo, kaj la ĉina lingvo, en sia skribita formo, restis dum certa tempo la lingvo de la »mondo«, ĉar la ĉino, kiel la greko, riĉa je kosmopolitaj ideoj emas kredi, ke li vivas en la centro de la mondo.

E trovis sian vojon en Ĉinujon ĉ. 1907. (Antaŭe faris provon propagandi E-n kelkaj eŭropanoj, sed ilia sukceso estis nur momenta.) Aperis ĉina E gazeto en Paris en 1907 La Nova Tempo, kiun eldonis ĉinaj studentoj kun scienca aj anarĥista enhavo. Kleruloj, kic Li Yu-ying, Tsi-fe Woo, Y. P. Tsai forte rekomendis E-n; tiun ideon aprobis ankaŭ la granda klasikisto, Liu ŝipej. La unuaj aktivaj pioniroj estis ĉ. 1909 Lu ŝi-ŝin en Shanghai kaj W. K. Hsu en Kanton kaj la du urboj de tio fariĝis fontoj, el kiuj fluas la ĉina E movado.

La fondiĝo de la respubliko en 1912 malfermis novan epokon. Y. P. Tsai, ministro por la publika instruado, dekretis la enkondukon de E en normalajn lernejojn. Fondiĝis asocio HEA kun centra oficejo en Shanghai. Membroj pli ol 3000. Grupoj en Kanton, Nanking, Ĉansu, Ĉangcau. Del. de UEA en Shanghai kaj Kanton. Aperis lernolibroj, vortaroj, koresponda kurso. Malfermiĝis kurso semajna kaj kurso supera. Ĉie propagando. Ĉie la gazetoj enkon-

dukis E fakon. Kunlaboris kun granda sindonemo Sifo en Kanton kaj K. C. ŝan en Shanghai. Brilis tiam du gazetoj: La Ĥina Socialisto en Shanghai kaj La Voĉo de la Popolo red. de Sifo en Kanton.

Sed la ora epoko ĉesis kun la malsukceso de la revolucio de 1913. Reakcia movado tra la lando. E-istoj (samtempe socialistoj aŭ anarkiistoj) persekutataj; la movado preskaŭ nuligita. Pro la politika haoso kaj pro la eŭropa milito sekvis de 1913 ĝis 1918 malluma tempo por la E movado. Tamen estis ankoraŭ individua propagando, notinda en Ĉansu, Kanton, Fatshan, Tientsin, Nanking, Peking, Honkong, Foo-chow.

La ĉeso de la mondmilito markis la reviviĝon ankaŭ en Cinujo. En 1921 la Nacia Edukista Konferenco adoptis proponon favore al E. Tsai, rektoro de la universitato en Peking, invitis Eroŝenko-n kaj Sunfiro-n malfermi E kurson en 1921. Kursanoj pli ol 500. Kunhelpis al la movado prof. Cen ŝuen Tung kaj prof. Ĉaŭ Co-jen. E kongreso en la Peking-a Universitato, 1922. Intensa laboro en 1922—23. Peking fariĝis nova centro, kie en 1925 fondiĝis E Kolegio, kiu vivis nur efemere. Krom Eroŝenko laboris energie ankaŭ la pastro Serišev, kiu propagandis kun granda sindonemo en Manĉurio kaj norda Cinujo.

Samtempe reviviĝas la movado en Shanghai. Fondo de asocio SEA en 1919. Kursoj malfermiĝis en Fu-Tan Univ. kaj kelkaj mezlernejoj en Shanghai en 1922. Eldoniĝas gazeto La Verda Lumo en 1923. Fondiĝas en Shanghai E librejo, biblioteko, refunkcias la koresponda kurso en 1925. Samtempe la movado eniras en la poŝttelegrafan rondon. Laboras energie Lu ŝi-ŝin, K. C. ŝan, Hujuez, Ĉan-ĉan-jin, Iĉio Sun kaj S. M. Ĉun. Krom Peking kaj Shanghai nia movado radiiĝas aliloke, notinde en Ĥin-kiang, Han-chow, Ĥekiang, Yunnan Sze-chuen, Kiang-si, An-hwei kaj Soo-chow.

Intertempe la movado en Kanton montriĝas preskaŭ nula. Sed ĝi revii-

viĝas en 1926 sub la gvidado de Won Kenn kaj Sinpak. Wu Takwang, direktoro por instruado, fondis E Instituton kun urba subvencio en 1926. Kunlaboras energie Sinpak kaj Won Kenn. En 1926 revenis ankaŭ la malnova pioniro Hsu. Fondiĝis grupoj en ĉiuj partoj de la urbo. Intensa propagando. Okazis grandioza Z festo en 1926. Granda procesio tra la urbo. Lanternoj, aŭtomobiloj, fajro-krakajo, pluvo de verda paperajo. 800 partoprenintoj. Kursoj malfermiĝas en Sun Yat-sen kaj Kuo Min Universitatoj kaj en 13 aliaj lernejoj (1927). Fondiĝis asocio KEA en 1929. Funkcias radio-kurso, rondira kurso ktp. en 1930. Eldoniĝas libroj, gazeto Kantona E-isto en 1931.

En 1929 nova centro ekstaris en Hankow. La movado venas preskaŭ subite, kun neatendita forto. Estiĝas asocio HEA, kursoj, gazeto Espero. Vigla movado, granda estonteco. Pioniroj: Tikos Fang, Fu-Pi-ĉing, k. a.

La movado en Peking (nun Peiping) forte malpliĝas depost 1926 sekve de la translokiĝo de la ĉefurbo al Nanking. Sed estas reviviĝo en 1931; granda movado en 1932. Krome fondiĝis grupoj en Ĥinkiang (pioniro Nauu Ĉangĝia Fu); kaj en Sui-Yuen (pioniro Wang Si-ĉaŭ). Radiiĝas ankaŭ nia movado dum 1932 en Tai-yuen, Foo-chow, Lienping, Ning-po, Soo-chow, Cheng-tu, Tsi-nan, Tsingtao, Amoy, Shen-si, Yun-nan, Nanking, Chang-sha, Shao-shin, Chun-chow, Swatow kaj en la universitatoj de Ĥing-Hua, Nan-Kai, Hu-Nan kaj ankaŭ en la arsenalo de Han-Yang. Fondiĝas ĉie grupoj, malfermiĝas kursoj, eldoniĝas bultenoj kaj flugfolioj. Estas reprezentitaj la int. organizaĵoj de E.

Registara subteno vidiĝas jene: la ministerio de edukado sendas kelkfoje delegiton al Int. E konferencoj kaj UK; urban subvenciojn ricevas Kanton E Instituto por du klasoj; la centra komitato de Kuo-Min-Tang malfermas E fakon en sia eksterlanda departemento. Krome estas oficiala uzo de E pere de Komitato de Int. Rilatoj (Nanking), kiu eldonis bro-

ŝurojn pri la japana invado en Ŝantung kaj Manĉurio.

Shanghai, Kanton, Hankow kaj Peiping fariĝas la centroj de nia movado. El la 4 centroj Shanghai okupas la unuan lokon, kie estis biblioteko, bona organizo, sistema laboro kaj tie oni reprezentis grandparte la nacian movadon. ŜEA (Shanghai) alvokis por organizi nacian movadon en 1931. Partoprenis KEA, HEA kaj grupoj kaj individuoj de Peiping, Nanking, Ĉin-king, Tien-tsin. Sed subite venis japana invado en Shanghai (jan. 1932). Oni ekmilitis. ŜEA perdiĝis en cindro. Sed malgraŭ ĉio, la ideo de la paco, la kerno de E-ismo, restas en la koro de la ĉino; tio ja povas certigi, ke E havas grandan estontecon en Ĉinuĵo.

WON KENN.

Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo. Originale de J. Scherer. 1933, 272 p., kun 107 bildoj. Raporto pri la mondvojaĝo de Sch. en 43 landoj per kaj por E. Tre interesa kaj grava dokumento pri la vivado de E eĉ en ekzotikaj landoj. Flua, facila stilo.

Cu li? Romano originale de Vallienne, 1908, 447 p. »Ĝi forte tenas la atenton ĝis la lasta paĝo. Ĝi estas historio de fatala eraro, kiu persekutas senkompate siajn viktimojn. Ĉiuj komplikitaj situacioj estas lerte prezentataj kaj la motivoj de la roluloj estas tre lerte klarigataj. Troviĝas en tiu ĉi libro multaj esprimoj, kiujn ni pli vole rigardas, kiel apartaĵojn de la aŭtoro, ol kiel modelojn por la ĝenerala E-a stilo. (A. E. W., British E-ist, 1908, p: 230.)

D

Da. Per ĝi oni apartigas certan kvanton en nedifinita (kvazaŭ senfina) nombro aŭ kvanto. Se la kvanto, el kiu oni apartigas, estas unu tuto, aŭ ĝi estas difinita (per si mem, aŭ per la artikolo, aŭ per posedaj, montraj pronomoj, aŭ per ĉiu, ĉiuj, aŭ per numeralo) oni devas uzi el, aŭ de.

Ekz. »du kaj duono da jaroj« (ĉar jaroj estas nedifinita, senfina nombro, »multe da panoj«, »glaso da vino«, »glaso da ruĝa vino«, »trupo da soldatoj«.

Sed: »duono de jaro«, »kvarono de pano«, (ĉar jaro, pano estas difinitaj unuoj), »la grupo de la kondamnitoj«, »peco el tiu tero«, »iom el lia mono«, »kvarono de ok«.

Specialaj esprimoj: »nubo da birdoj«, »maro da mizero«, »laĉo da koraletoj«.

Krome, per da ni akcentas la kvanton, per de aŭ el la kvaliton. »Roto da soldatoj« emfazas la roton, »roto de soldatoj« emfazas la soldatojn. KALOCSAY.

Dahl (dal) Einar (ps. Valo), svedo, instruisto en Uddevalla. Nask. 1 marto 1904 en Falun. E-isto de 1921. Estrarano de S Instr. EF. Prez. de Universala E Pacifista Ligo de 1931. Originaĵoj kaj tradukaĵoj, multaj artikoloj.

Dalmau Delfi, kataluno, prof. de hispana, franca kaj angla lingvoj. Nask. 31 jul. 1891 en Figueres. Fondinto de Dalmau-Liceo en Barcelona, 1920, kun filioj en kvin aliaj urboj. Aŭtoro de du katalunaj romanoj. E-isto de 1909. Plurfoje komitatano kaj prez. de KEF. Fondinto de E movado en Bahia Blanca (Argentino).

Kunlaborinto, red. de K. E-isto. Premiito kaj juĝantarano de la Floraj Ludoj. Kunlaboris al La Revuo, E, HDE.

Dambe David, litovo, komercisto. Nask. en 1895 en Telsiai. E-isto kaj SAT-ano de 1924. Kunlaboras al la SAT-organoj. Siajn rakontojn li ĉerpas el la nigrega vivo kaj sorto de la nigra raso. Kun granda lerto kaj observkapablo li pentras la vivon, animstaton kaj pensmanieron de la subpremitaj negroj, kiuj sopiras la iaman liberon. La rakontoj estas interesaj kaj la fakto, ke ili efikas per la forto de la realo, ne vualante la maljustojn de la »blanka kulturo«, altigas iliajn literaturajn kvalitojn.

EMBA (SAT).

Dambrauskas Aleksandro, (Dombrovski, ps. A. Jakstas), litovo, prelato, prof. Nask. 26 aŭg. 1860 en Kuroniai. Ekzilita 1889—95 de la rusa cara registaro, ĉar li malpermesis al katolikaj lernantoj obei ordonon pri vizitado de rus-ortodoksa preĝejo. De 1907 prez. de katolika libroeldona socio kaj red. de diversaj revuoj. Multaj verkoj en lingvoj litova, pola, rusa, latina kaj E. Kiel studento en la Petrograda Pastra Akademio en 1887 li eksciis pri la apero de E kaj tuj skribis al Z poŝtkarton kun promeso tuj lerni E-n. Semajnon post la ricevo de la unua libro li skribis al Z sian unuan poŝtkarton en E (sen eraroj). L. K. Estis prez. de LEA, dir. de IKA por L-ujo, redaktoro de L Stelo. Verkis la unuan L lerno-libron, 1890, Tilsit. Multaj artikoloj en diversaj E gazetoj. Verkis: du matematikajn libretojn, 1905 kaj 1906; Versajareto, 1905, 29 p.; Mal-

grandaj pensoj pri grandaj demandoj, 215 p. Kunlaboranto de Litova Almanako, 1923.

Damen Henri, nederlandano, komercisto. Nask. 29 majo 1892 en 's Hertogenbosch. E-isto de 1908. Prez. de NKEĽ kaj red. de N Katoliko 1912—16 kaj 1930—31.

Dancu, Marionetoj. Originala novelaro de J. Baghy. 1927, 176 p. »La samaj kvalitoj, kiuj distingas lin, kiel poeton, montras sin klare ankaŭ ĉi tie: profunda sento, sincera korektremo kaj plenkora homa komprenemo por la elpuŝitoj de l' vivo, aparta inklino por la filozofia profundigo de l' temoj, penetra kaj tial ofte pesimisma vidmaniero, kolora kaj sukoŝvela, tamen konciza kaj rapida lingvo.« (K. Bodó, Hungara Herald-o, febr. 1928.)

Dandová Ludmila, ĉeĥoslovakino, fotografistino en Praha. E-istino de 1914, laboras precipe en katolikaj rondoj, redaktas la bultenon Informilo.

Dansk Esperanto-Blad. Organo de CDEĽ, fondita en 1928; formato 23×17 cm. Red. M. Palsberg.

Danubo. 1. Organo de la rumanj kaj bulgaraj E-istoj. Bucureŝti. Red. D-ro. Robin. Nur skribita en E. Ĝi estis la kunigo de Lumo kaj Rumana E-isto, 1-a jaro okt. 1910—aug. sept. 1911—11 kajeroj (12 n-roj) 11×IV—360 p.; 2-a jaro dec. 1911—julio 1912—6 kajeroj, (7 n-roj.) 6×IV. +200 p. 24×16. Krom propagando, kroniko, organizaj kaj lingvaj demandoj D. enhavis modelajn proz- kaj literaturajojn. — 2. De majo—julio 1931 aperis ankaŭ D., monata gazeto por org. kaj prop. eld. ES »Solidareco«, Red. D. Ivanov. 3 kaj. po 8 p. 24×16. P. TARNOW.

Danujo. Jam antaŭ 1850 du danoj, la fama lingvisto Rasmus Rask kaj la komedi-verkisto Thomas Overskou sendepende unu de la alia sin okupis pri konstruado de artefarita lingvo. Sed la ĝenerala publiko ne konatigis kun tiu demando antaŭ ol Volapük eniris en Danlandon 1886 kaj post malmultaj jaroj malaperis.

La unua dana lernolibro de E, verkita de Christian Nielsen en aperis en Flensburg 1890. Versajne nur tre

malmultaj adeptoj de E troviĝis en Danlando antaŭ la apero de vortaro kaj lernolibro de Fr. Skeel-Giörling, (1904), »la patro de la dana E movado«. Li faris siajn unuajn kursojn en Aalborg ĉirkaŭ 1904, sed poste li transloĝiĝis al Kopenhago, kie li daŭrigis sian laboron kun granda sukceso.

La konata lingvisto, prof. Otto Jespersen (aŭtoro de la lingvo-projekto »Novial«) varme interesiĝis pri E kaj publikigis longan rekomendan artikolon pri ĝi en la multe legata revuo »Tilskueren« (1905). Samtempe alia fama lingvisto prof. Vilhelm Thomsen verkis kaj eldonis broŝuron pri »la komuna lingvo de la scienco.«

Fine en 1906 fondiĝis la unua E grupo dana, »E-ist-foreninge«, kies unua prez. estis magistro Holger Wiehe kaj ĝia sekr. f-ino Gunvar Monster. Post unu jaro tiu grupo ekeldonis la unuan danan E gazeton E-Bladet: Helpa Lingvo, kiun redaktis Wiehe. Fervoraj E-istoj faris paroladojn pri la nova lingvo, precipe Skeel-Giörling kaj Monster.

En 1907 la plej granda Kopenhaga gazeto »Politiken« ekinteresiĝis pri E kaj aranĝis kursojn kun 350 kursanoj. Skeel-Giörling instruis ilin. Ankaŭ en Kristana Unuiĝo por junuloj en Kopenhago li aranĝis kursojn. Post tiuj kursoj fondiĝis E grupo por junuloj, kies prez. fariĝis Svend Rehling. En laboristaj rondoj gvidis Leo Abraham kursojn kaj fondis poste grupon. Tiuj du grupoj ne vivis longe.

Ankaŭ ekster Kopenhago la E movado ekfloris. En Odder kaj Brønderslev okazis kursoj, kaj en Randers kaj Faaborg fondiĝis kluboj. Plej vigle laboris la klubo en Odense, kie N. C. Carlsen en faris gravan propagandon. En la tiea komerca lernejo oni komencis instrui E-n. Baldaŭ sekvis la seminario en Odense. La klubo en Odense fondiĝis 1907, 1910 fondiĝis la laborista klubo. En Kopenhago Bendix, P. Borberg, f-ino Monster kaj Skeel-Giörling faris la plej grandan laboron. Bendix instruis i. a. E-n en kurso de 300 telefonistinoj. En jan.

1908 fondiĝis laŭ instigo de t-ino Schröder Centra Dana E-ista Ligo (CDEL). 1909 fondiĝis »Aalborg EK« (prez. E. Friis), »EK de Vejle« (M. Packness), »Randers EK« (serĝento Rasmussen), »Konversacia Klubo de Aarhus« (Chr. Heilskov) kaj en 1910 »ES de Esbjerg.«

La unua jarkunveno de danaj E-istoj okazis en Aarhus 1909. Poste en Kopenhago 1910, Odense 1911, Vejle 1912, Aarhus 1913, Horsens 1914, Odense 1915, Kopenhago 1916, Kolding 1919, Grenaa 1925, Sønderborg 1927, Odense 1928, Holbæk 1929, Kopenhago 1930, Odense 1931, Aarhus 1932, Odense 1933.

Post la granda antaŭenpuŝo en 1907—09 la dana E-movado dum pluraj jaroj pli malrapide progresis. Tre notinda tamen estas la agado de E-oficejo en Kopenhago, kiu en la komenco de la milito tutmonda interrilatis kun la militantaj landoj kaj faris gravan kaj plejparte sukcesan laboron por serĉi vunditajn kaj malaperintajn homojn en ĉiuj landoj kaj doni informojn al iliaj parencoj.

Post la apero de Ido venis malfacila tempo por la dana E-movado. Multaj E-istoj transiris al Ido, i. a. prof. Jespersen, kiu en Kopenhago kaj per la gazetaro en la tuta lando gvidis fortan batalon kontraŭ E. Lia famo helpis lin; sed li ne sukcesis krei grandan Ido-movadon. Oni fariĝis skeptika pri la mondlingva problemo — jen la ĉefa kaŭzo de la multjara malprogresado de E en nia lando, fakte ĝis 1927, kaj post tiam denove kelkajn jarojn pro la apero de Novial («Jesperanto» kiun vorton moke kreis unu el la Kopenhagaj gazetoj). Notinde estas, ke la kontraŭ-Ido-polemikon gvidis f-ino M. Noll, Kopenhago.

En la vintro 1925—26 okazis disaŭdigo de E-kurso per la danaj radio-stacioj. Ĝin gvidis ĉefinstruistino Rybo. Grandmase estis aĉetataj lernolibroj, sed la radioestaro post kelkaj monatoj malpermesis tiun E-kurson (motivo: tro malmultaj interesas sin pri E.) Aŭtunon 1927 denove disaŭdiĝis E per la radio-stacioj, sed nur kiel ĉiusabata programresumo.

31 dec. 1927 vespere la dana radiofonio sendis saluton al eksterlando en dana, angla, franca, germana kaj E-lingvoj. Post tiu tempo la radio-estaro ne plu volis permesi E-n.

Ne ekzistas multaj lernolibroj en dana lingvo. Tiuj de Chr. Nielsen kaj de Packness ne estas multe konataj. La plej bona estas la lernolibro de Skeel-Giörling. Unua eldono baldaŭ elĉerpiĝis kaj sekvis novaj; post la morto de la aŭtoro ĝi ne plu estis eldonata. En 1918 P. Zoffmann eldonis sian lernolibron; 1922 aperis dua eldono. 1924 aperis lernolibreto de M. Noll. 1930 aperis nova lernolibro de L. Friis.

Vortaroj. La unuan E-vortaron eldonis Skeel-Giörling (1907). En 1909 eldonis K. Bendix sian D-E vortaron. Post la morto de Skeel-Giörling lia vortaro ne aperis en dua eldono, sed A. P. Dueholm eldonis bonegan E-D vortaron. 1922 P. Zoffmann eldonis sian vortaron kun E-dana kaj dana-E partoj. Ĝi estas multe aĉetata de komencantoj, ĉar ĝi enhavas ambaŭ partojn, sed ĝi ne estas tiel detala kiel la aliaj. — Korespondan kurson, kiu konsistas el 6 lecionoj, eldonis CDEL en 1928. Kvankam ĝi estas tre konciza, ĝi tamen estis multe vendata pro vigla propagando.

Post fondiĝo de CDEL aperis multaj danaj E-gazetoj: 1907—12 Dana E-isto, red. A. Nissen, 1912—13 Danlando, sama redaktoro. Dum la mondmilito ne aperis dana E-gazeto. 1919—20 E-raporto de CDEL. 1920—22 denove ne ekzistis dana E-gazeto. 1922—26 aperis raporto pri dana E-movado en »E« de UEA 1926—28 eldonis P. Neergaard je propraj kostoj kaj risiko »La Forta Voko«-n, sed ĉar li kontraktis kun la revuo »Sind og Samfund« pri aperigo de »La Forta Voko« en ĝi, decidis CDEL mem eldoni sian gazeton Dansk E-Blad (dana E-gazeto), redaktoro M. Palsberg, Aarhus.

Ekzamenoj okazis jam en 1908, sed post tiam neniu partoprenis en ekzamenoj ĝis 1928, kiam CDEL ellaboris tute novan ekzamenregulon. Ĝi konsistas el 3 gradoj: I, II

kaj III. La lasta estas por kursgvidado. Per tiu nova regularo okazis multaj ekzamenoj en diversaj lokoj, kaj ofte kun granda aro da partoprenantoj.

La stato de CDEL en la fino de 1932 estas: 15 grupoj kun proks. 500 membroj. Kelkaj kluboj ne apartenas al CDEL, kaj izoluloj ne povas esti membroj de CDEL sen aniĝo al klubo. Entute estas venditaj proks. 15000 lernolibroj en Danlando.

En diversaj urboj fondiĝis laboristaj grupoj, kiuj ne apartenas al CDEL, sed intencas starigi propran landan organizon. R. Jørgensen, Aabyhøj, faris tiurilate grandan laboron.

En 1920 okazis Ĉe-kurso en Odense gvidata de T. Morariu. 1931 venis Ajo, Karlsruhe, al Danlando por je propraj kostoj kaj risko gvidi Ĉe-metodajn kursojn. Tion li tre sukcese faris. Li propagandis kaj instruis en Sønderborg, Lunderskov, Kolding, Aarhus, Aalborg kaj Randers. En somera ferio 1932 aranĝis L. Friis en Silkeborg Ĉe-metodan kurson por geinstruistoj kun Ajo kiel gvidanto. Tiuj pli ol 30 geinstruistoj ne nur lernis la lingvon, sed hejmenveninte preskaŭ ĉiuj propagandis kaj gvidis E-kursojn. Aŭtune 1932 alvenis Ĉe-instruistino M. Saxl, Berlin, por gvidi kursojn. Ŝi instruis en Silkeborg, Aarhus, Aalborg, Hobro, Hjorring, Brønderslev, kaj Randers.

CHR. HEILSKOV kaj L. FRIIS.

Danzig. Libera urbo en la ŝtato D. kun 238.000 loĝantoj. Laŭ UEA-1928 pioniroj estis s-ino A. Tuschinski kaj L. Rajkowski. DEA estis fondita en 1907 de s-ino Tuschinski. Dum ĝia 25-jara ekzistado la Asocio plenumadis neinterrompitan varbad-kaj instrulaboron. Okazis kursoj en popolalternejo, krom tio por komercistoj, fervojistoj, tramistoj, soldatoj, policistoj, doganoficistoj ktp. En 1927 (28 jul.—4 aŭg.) tie okazis la 19-a UK kun 905 kongresanoj el 35 landoj sub la prezido de B. Aeltermann. Dum la malfermo C. Lindhagen, ĉefurbestro de Stockholm, parolis E-lingve. Oni plantis jubilean kverkon sur la E-Pla-

co, kie staras ankaŭ E-monumento. Okazis enketo pri la lerneja instruado de E. Por E laboradas krom DEA ankaŭ Katolika, Laborista, Bontemplana kaj Pacifista Grupoj.

Darberi Francesco, italo, ŝtatoficisto; fondinto de entrepreno pri elektra lumigo de Tomboj. Nask. 29 marto 1861 en Roma, mortis 1 marto 1930. E-isto de 1903. En 1905 kunfondis E societon en Roma kaj estis prez. ĝis sia morto.

Datoj kaj faktoj pri la paca movado. De Nilsson. 1926, 48 p. »Laŭteme kaj laŭdate ordigita tabelo kaj informaro pri ĉiuj klopodoj, verkoj, organizoj, konferencoj celantaj al homara paciĝo. Laŭdinda traduko.« (G. S., „E“ 1926, p: 182.)

Davidov Georgo K., armeno. Nask. 1879 en Armavir (Norda Kaukazo). Al E aliĝis en 1892. En 1903 venis urbon Saratov (Ruslando) kaj komencis tie fervoran propagandon. En 1905—07. D. subtenis multajn E-gazetojn, eldonis prop. broŝurojn kaj sigelmarkojn, E-igis kelkajn literaturajojn el kaŭkazaj lingvoj, sed famiĝis lin precipe lia unika E-biblioteko, por kiu li penis akiri ĉion presitan en aŭ pri E. En Berlin 1908 kaj en Wolfenbüttel 1911 estis eldonita kompleta katalogo de la biblioteko de D. Ankaŭ estas atentindaj la statistikaj laboroj de D. pri eldonitaj E-lernolibroj, originala kaj tradukita E literaturo (»titolaroj«) kaj pri E-gazetaro. v. Biblioteko de Saratov.

Davidson Tellef, norvego, distrikta lernejestro. Nask. 1848, mortis 3 okt. 1921. Vojaĝinta sekr. de IOGT. Elokventa oratoro, kiu multe kaj lerte propagandis per paroladoj kaj per bontemplana gazetaro. E-isto de 1905. Ellaboris elementan korespondan kurson 1906 kaj fondis koresp. klubon 1907 kun sekcioj en 8 urboj. Verkis N-E vortareton, 1907.

Davis (deĵvis) Robert Augustus, anglo, romkatolika pastro. Nask. 2 dec. 1860 en Bath. Prez. de Angla Ligo de Katolikaj E-istoj. Artikoloj en The E-ist, 1903. Ankoraŭ estas aktiva E-isto.

Decourt (dökur) Lucien, franco, prof. Nask. 3 majo 1868 en Mâcon,

mortis 31 dec. 1923 apud Paris. E-istigita de Bourlet kiam li estis prof. en la militista kolegio en La Flèche, li havis la ideon krei Federaciojn kaj organizis ilin. La unuaj estis fonditaj en 1907—08. Dek ekzistis en 1910.

Degen Artur, germano, popollerneja instruisto. Nask. 6 jun. 1879 en Leipzig. Ekzamena komisararo de la E Instituto por G. Vigla propagandisto en meza G per paroladoj, montro-lecionoj laŭ la rekta metodo kaj per gvido de kursoj. Fondis en 1910 la Leipzigan E Instruistaron. Estis prez. de E Asocio de G Instruistoj. Fondis TAGE en Wien, 1924. Verkis: *Kleines Lehrbuch*, lernolibro, 1915; (kune kun Kötz) *Vortareto E-G* kaj *G-E*. E Lernolibro por popollernejoj, 1930—32; *Du Fabeloj de Grimm*, 1929; *La Sorĉistina Kanto*, melodramo de Wildenbruch-Schillings, 1932.

Degenkamp (dehenkamp) Gijsbertus Johannes, nederlandano, pentristo. Nask. 24 febr. 1895 en Utrecht. E-isto de 1915. Kunlaboris al *Holanda Pioniro*, *Nederland-E. Holanda E-isto*. Red. kun F. Faulhaber la lingvo-aldonon de *Laborista E-isto*; kaj *Utrehtan E-iston*. Aŭtoro de *Konsilanto pri E-gramatiko*. Kursgvidanto kaj prez. de loka grupo.

Degon Paul, franco, d-ro, adv. en Neuilly-sur Seine. L. K., UEA-del. Kunlaboris je *La Revuo* kaj *Jarlibro* de UEA.

Deguĉi Onisabro, japano, ĉefo de Oomoto-ismo, prez. de Universala Homama Asocio. Nask. 12 jul. 1871 en vilaĝo Asao, Kyoto-hu. Eklernis E-n en 1923, kaj samtempe enkondukis ĝin en O-ismen, kiel la ĉefan lingvon por eksterlanda propagando de O. 1924 fondis E Propagandan Asocion en Kameoka. Verkis: *Poemataroj* (por facila memorigo de E-aj vortoj), 1924.

Dejan (dōjan) P'erre, franco, scienculo. Nask. 11 jun. 1877 en Lussac-les-Châteaux (apud Poitiers). Inĝeniero, li laboris ĉe la firmo Schneider (le Creusot) ĝis 1914. Post la milito li eniris en la Universitaton. Prof. ĉe la Scienca Fakultato en Grenoble, ktp. Sekr., poste prez. de grupoj kaj

prez. de la Burgonia federacio ĝis 1912. Kreis en 1913 la sekcion de fizikistoj kaj kemiistoj de ISAE. En 1932 komitatano de ISAE. Fervora propagandisto. Sciencaj artikoloj en *Scienca Revuo*.

Deklaracio. Romano verkita de T. Ariŝima, el la japana trad.. T. Togu, 1924, 125 p. »Romano sub formo de leteroj interŝanĝitaj de du junuloj, kiuj fine malkaŝigas kiel amkonkurantoj. Adeptoj de psiko-analizo trovas argumentojn en la senkaŝa konfeso de junulo pri knabecaj amdeziroj.« (G. S., 'E' 1924, p: 188.)

Deklaracio de Boulogne. En la unua kunsido de la 1-a UK en Boulogne-sur-Mer, 7 aŭg. 1905, Z legis sian deklaron, kies teksto iom ŝanĝita de la komitato, estis prezentita al la kongresanoj de Boirac en la kvara kunsido en ĝia definitiva formo kaj akceptita de la kongreso. La D. fariĝis kvazaŭ lingva E-ista »Kredo«. Jen estas ĝia tuta teksto:

»Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia kongreso Esperantista en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon:

1. La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu »ne intrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn«, donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj insti.ucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia Esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.

2. Ĉar en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke lingvo internacia povas esti nur lingvo arta, kaj ĉar el ĉiuj mult-

egaj provoj, faritaj en la daŭro de la lastaj du centjaroj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj pleje taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto, tial la amikoj de la ideo de lingvo internacia, konsciante ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingata nur per laborado praktika, jam de longe ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.

3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas »nenies propraĵo«, nek en rilato materiala, nek en rilato morala.

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj; kiel spiritaĵoj de tiu ĉi lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo Esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

4. Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia Esperantisto, karakteron absolute privatatan kaj por neniu devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj Esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo »Fundamento de Esperanto«, en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj »tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto«. Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la »Fundamento de Esperanto«, ĉiu Esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tie same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj Esperantistoj estas rekomendate imitadi

kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo Esperantista por ĉiu Esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

Deklaracio pri homaranismo. De Z. 1913, 14 p. »Li ne nasku al maturo E malpli aĝan fraton, kiu dependas de la amata unuanaskito la patrajn karesojn.« ktp. (N. K., L. 1. 1913, p: 469.)

Delegacio. En 1900 francoj L. Couturat kaj L. Leau, eluzante la lingvajn malfacilaĵojn en int. kongresoj, dum tutmonda ekspozicio en Paris iniciatis Delegacion por alprenado de la lingvo int. La delegitoj 17 jan. 1907 fondis ĝin kaj ellaboris programon kun la celo — peti Int. Ligon de Akademioj (fonditan 1900) elekti Lingvon Int., aŭ, se tiu rifuzus, mem krei komisionon por la elekto. Ĝis okt. 1907 Couturat kolektis sub la deklaracio pri dezirindeco de lingvo int. subskribojn de 307 societoj kaj 1251 scienculoj. Multajn subskribojn havigis e-istoj N. Evstifejev, rusa e-isto, monsubtenis Couturat per pluraj milfrankoj. Per tiu mono estis eĉ dungita sekretario, angla e-isto. Couturat diplomate asertis, ke E havas ĉiujn ŝancojn triumfi, kaj nur pro taktiko li ne malkovras sian laboron por E. En 1905 la Delegacio petis Int. Ligon de la Akademioj fari la elekton. 29 majo 1907 la lasta rifuzis, decidinte (12 kontraŭ 8 kaj 1 detena) ne pridiskuti demandon pri lingvo int. 25 jun. 1907 Couturat aranĝis elekton de 12-ana Komisiono de la Delegacio (la kandidatoj ricevis pli ol 242 voĉojn el 253 balotantoj kaj el 331 delegitoj). La e-istoj elektis dum la UK en Cambridge specialan komisionon por trakti kun la Delegacio. La Delegacia Komisiono kunvenis 18 foje en Paris 15—24 okt. 1907 por ekzameni la proponitajn sistemojn de lingvo int. Laŭ peto de Z mem E es-

tis defendata de L. de Beaufront, la 2-a patro de E. Ne povantaj veni Parizon kelkaj anoj sin anstataŭis per aliaj personoj. 24 okt. 1907 dum la lasta kunsido la ĉeestantaj 9 anoj W. Ostwald, L. Couturat, L. Leau, Baudouin de Courtenay, O. Jespersen, Dimnet, P. Hugon. G. Moch, Rodet ĉiesvoĉe akceptis principe E-n, sed sub la kondiĉo de kelkaj ŝanĝoj efektiviĝotaj de la Konstanta Komitato, laŭ la senco difinita en la konkludoj de la raporto de la sekretarioj (Couturat kaj Leau) de la komisiono kaj de la projekto »Ido«, provante interkonsenti kun la E-ista L. K. Samtage en la Konstantan Komitato estis elektataj: W. Ostwald, prez., Baudouin de Courtenay, O. Jespersen anoj; L. Couturat, L. Leau, sekretarioj. Poste oni alelektis L. de Beaufront »pro lia speciala kompetenteco«. 2 nov. 1907 la Konstanta Komitato informis oficiale pri ĉio Z kaj E-istan L. K. kaj petis respondi antaŭ 6 dec. La decido prokrastiĝis, ĉar L. K.-anoj respondis malrapide. 14 dec. W. Ostwald deklaris, ke la Konstanta Komitato de nun agos libere kaj rezervas al si la rajton sin turni al la publiko en ĉiu formo opiniata utila. 7 jan. 1908 prez. de E-ista L. K., E. Boirac publikigis la respondon: el 61 L. K.-anoj nur 8 plene aprobis la Delegaci-reformojn en E. 18 jan. li deklaris al la Konstanta Komitato, ke konsente kun Z kaj plimulto de la L. K.-anoj al E-istoj ne eblas fleksiĝi sub postuloj de la Delegacio. Samdate Z alvokis per »Cirkulera letero al ĉiuj E-istoj« resti fidelaj al E, ĉar nur per severa unueco estas akirebla konfido de la mondo. La tasko de la Delegacio estis nur elekti, sed ne reformi. 29 marto 1908 Z rifuzis la nomon E (reformita) por la nova lingvo. Oni ĝin poste nomis definitive »Ido«. Ĝis majo 1908 L. de Beaufront energie kontraŭbatalis reformojn en E. Nur tiam li demetis la maskon kaj deklaris, ke aŭtoro de Ido estas li. Ĉ. 20% de gvidaj E-istoj komence transiris al Ido. Poste la % de idostoj-eks-E-istoj malkreskis ĝis 3—5%. El 307 societoj ĝis 1910 nur 14 aprobis Idon. La rompo inter la Delegacio kaj e-istaro estas klarigebla per tio,

ke ambaŭ flankoj esperis venki apartiĝinte de la alipartianoj. T. INDRA.

Noto de M. C. Butler. La »Delegitaro« estis unu-homa afero, sen kunvenoj aŭ diinita regularo. La unu klara regulo, ke aŭtoroj de lingvoprojektoj ne rajtas partopreni, estis rompita. El la 12 membroj de la komitato nur du estis lingvistoj, kaj nur 4 partoprenis; oni aldonis nomojn de anstataŭantoj aŭ novaj membroj sen rajtigo. La fina rezolucio estis voĉdonita de nur tri el la 12 plus 4 anstataŭantoj kaj la sekretarioj. Oni sendis al la L. K. 25 kopiojn de la projekto, por disdoni ĝin inter 100 membroj de la L. K. (loĝantaj ankaŭ ekster Eŭropo) kaj postulis respondon post unu monato.

Delegito de UEA, estas reprezentanto de la Asocio, plenumas la servopetojn de la membroj, enkasigas la kotizojn kaj laŭ propra iniciato klopodas por UEA en taŭga maniero kaj laŭ la circonstancoj. Ĝi estas honora ofico, plenumata por pravi la skeptika mondo la utilon de la lingvo per ĝia organizajo. Ĉiu membro de UEA rajtas uzi la servojn de la delegito. La servoj estas senpagaj, sed la uzanto devas repagi la elspezojn de la delegito, rezultantaj de la petita servo. Oni povas peti informojn pri komerco, industrio, trafiko, laboro, dungado, salajroj, vojaĝoj, turismo, instruado, junulaj, studentaj kaj virinaj aferoj ktp. Oni ne povas peti informojn pri komerca pagokapablo, morala indeco de persono (konfidencaj informoj). Tamen, tiuokaze la delegito rajtas interrilatiĝi kun loka agentejo, kiu sin okupas pri tio. La delegito ankaŭ rajtas rifuzi servojn, kies plenumon li juĝas kontraŭa al sia konscienco aŭ honoro. (Laŭ la praktika gvidilo: La Servaro de UEA, 1932.)

Delegitoj rajtigataj. v. Organizo.

Deligny (dölinji) Ernest, franco, licea prof. Nask. 9 dec. 1864 en Fauquemergues (apud Boulogne-sur-Mer). Direktis dum 30 jaroj sportajn societojn. Estis Volapükisto; li fariĝis E-isto en 1900. Propagandisto, fonda grupojn, kaj, kun kelkaj samideanoj, la nordfrancan federacion (1908), kies prez. li estas. Kreis en 1908 la Norda

Gazeto, kiu ĉesis aperi en 1914 kaj reaperis en 1930. Ĝen. sekr. de la XII. U. Kongreso (Hago, 1920); organizis 4 E-ajn ekspoziciojn en Saint-Omer kaj Boulogne-sur-Mer. Li verkis Cours élémentaire d'E, 1905; Traduko el la greka lingvo: Ranratbatalo, 1908; La vivo de liceano, diaĵoj 1925; Traduko de Dumas: Tri rakontoj, 1933.

Delmas Gabriel, franco, direktoro de presejo. Nask. 12 aŭg. 1861 en Bordeaux. Okupas sin ankaŭ pri teknika instruado, kaj precipe pri ekonomiaj kaj sociaj demandoj. Patro de la revuo »Sud-Ouest Economique«. Lia patro estis kreinta la famajn »Tableaux auxiliaires Delmas« (Delmas'aj Helpaj Bildoj) por instruado de vivantaj lingvoj per senpera metodo. Estante el la unuaj francaj E-istoj, D kreis tiajn bildarojn kun libreto koncerne la lingvon E, kun kunlaboro de Beaufront. Li publikigas artikolojn pri E.

Demandaro, pri la historio, literaturo kaj organizaĵoj de E por ekzamenoj. Kompilis R. de Ladevèze, reviziis kaj kompletigis A. Göhl. 1923, 112 p. Lerte aranĝita manlibreto.

Demarcy (dömarsi) Léon, franco, juristo. Nask. 1 apr. 1860 en Breteuil (apud Amiens), mortis 25 febr. 1928. Propagandis fondante grupojn en Norda Francujo kaj skribante artikolojn. Verkis kun Dumenil L'Esans maître, 1917.

Demarest (demare) Louis, franco, instruisto. Unu el la kunfondintoj de SPPEU, 1898 kaj el la unuaj propagandistoj, nome en »Journal des instituteurs«, 1899. Prezidis la grupon de Reims ĝis 1902, poste forveturis al Konakry (Gvineo).

Demidjuk G., ruso. Estis red. de La Nova Epoko, S. R., Bulteno de CK SEU, kunlaboris je La Ondo de E, Sulo, E Hejme. Verkis Radio-E kun E-rusa radiovortareto, 1926, tradukis Stato kaj revolucio, 1926 kaj Pri religio, 1929, ambaŭ de Lenin kaj Komunista movado, historia skizo, 1923. Estas L. K.

De Paĝo al Paĝo. Literaturaj profiloj de L. Totŝche pri Baghy, Bo-

dó, Hilda Dresen, Engholm, Jean Forge, Hohlov, Kalocsay, Kenelm Robinson, R. Schwartz, Sturmer kaj Szilágyi. 1932, 120 p. »Ĝia eldono signis literaturan daton, ĉar ĝi estis la unua serioza provo altigi nian kritikadon ĝis kritik-arto, kian oni trovas en la kulturlingvoj.« (Artikolo de Johnson en la Facila Legolibro, 1932, p. 60.)

Deshays (dehe) René, franco, licea prof. Nask. 11 febr. 1870 en Sens. Okupas sin ankaŭ pri muziko, pri kooperacio kaj pri Libera Penso. Fondis plurajn grupojn en Orient-Francujo. Sekr. kaj red. de la bulteno de la societo »Libera Penso« (1907—1914). Krom diversaj E-istaj muzikaĵoj li verkis: Traduko de Chateaubriand: Aventuroj de l'lasta Abencerago, 1907. Popola Frazlibro, 1908.

Deŝkin Georgo, ruso, oficisto. Nask. 23 febr. 1891 en Vilno. E-isto de 1908. Kune kun litovo Kepalas kaj polo Niewenglowski li fondis Vilnan societon E-istan, estis delegito de UEA. En 1909—15 kaj poste en 1922—23 li presigis multajn originalajn versojn en E gazetaro. Tiujn versojn distingas tre delikata lirikismo, flua kaj eleganta bonstilo, simpla kaj melodio. La temaron de Deŝkin limigas tamen la nuraj motivoj pri amo kaj naturo. En kondiĉoj de rusa revolucio tia temaro ne multe harmonias kun la epoko kaj do D. jam delonge nenion plu verkis. Solan tributon al la revolucio li faris per sia ruslingva poemkolekto Entiaĵoj, 1917. Liaj versoj en aparta libreto aperis en 1912. En 1922—27 D. estis komitatano de Tutruslanda unuigo de poetoj.

N. NEKRASOV.

Deubler (dojbler) Konrad, germano, telefonteknikisto ĉe la poŝto. Nask. 30 okt. 1885 en Rosenheim. Politike kaj sindikate agas en la laborista movado. E-isto de 1911. Organizis post la milito la laboristan E movadon en Bavarujo. Kunfondinto de SAT. Red. de Arbeiter E-ist en 1927—29. Post la skizmo en LEA li aniĝis al Socialista E Asocio, kie li estras grupon kaj regionon. Verkis Iernolibron,

(1927) kaj multajn artikolojn pri E en socialistaj gazetoj.

Deutsche Esperanto Buchhandlung estas fondiĝinta en 1903 kaj funkcias de tiu tempo en Leipzig, vendante E-librojn.

Deutsche Esperanto Centrale v. Friedrich Ellersiek G. m. b. H.

Dévy (devai) Leó, hungaro, hospitalkuratoro. En 1927 aperis de li la unua parto de detala H-E Vortaro.

Devjatnin Vasilij Nikolajevič, ruso. Nask. en 1862 kaj pasigis siajn infanĵarojn en la sovaĝa Orlova regiono. Fariĝis instruisto de la latina kaj rusa literaturo en Kiew, poste en Vilna. Antaŭe li estis Volapükisto. En 1891 li ekkonis E-n. Post unumonata studado li jam tradukis la poemon de Lermontov: *Angelolo*, presita en jul. n-ro de *La E-isto*. De nun li fariĝis korespondanto, poste amiko de Z. Partoprenis la 1-an UK kaj iĝis LK. Ĉe la UK 1911 gajnis la unuan premion de lit. konkurso. El Antwerpen, laŭ la invito de Sebert, li iris Parizon, kie dum unu jaro vigle laboris por E; poste piediris (kun la turka E-isto Roman) dum 42 tagoj al la Krakova UK. Post la kongreso laboris en München por la entrepreno *Parkurbo Esperanto* (v.), post kies fiasko li vojaĝis al Leipzig por labori en la E-a Instituto. Fine de jul. 1914 li ekveturis al Paris por la UK, sed nokte la vagonaro estis haltigata, ĉiuj al-Parizaj vojaĝantoj estis arestataj kaj per longaj flankvojoj oni resendis ilin al Leipzig. D. fariĝis militkaptivo en urbeto Traunstein apud Leipzig ĝis 1918. Post la unua jaro D. povis daŭrigi sian E-istan agadon, donis E-lecionojn al germanaj suboficiraj, ricevis eĉ salajron. En 1918—22 li laboris en Leninograd, gvidis kursojn, estris societojn; ktp.; de tiam li vivas en Kiew. La literatura agado de D. estis ampleksa. De li aperis en *Fund.* *Krestomatio* versajoj originalaj kaj tradukitaj kaj la originala rakonto *Arturo*. Tradukis la poemon de Lermontov: *Demono* (1894, 57 p., la 73-a libro E-a); verkojn de Puŝkin: *Boris Godunov*, 1894—95; *Poltava*, 1906; *Ruslano kaj Ludmila*; kaj multajn aliajn poemojn rusajn kaj alilingvajn. Verkis la komedietajn originalajn:

Edziĝo; *Nefinita dramo*; *La instruita mimikisto*; verkis la rakonton en versoj *Nevola mortiginto*, 1896; kaj *Unuaj E-Satiroj*, 1919. Kolekto de liaj lit. verkoj aperis en kvar volumoj de *Plena Verkaro* (1906—11; 584 p.). Aliaj verkoj: *Prop. piedvojaĝo alla oka*, 1913 (94 p.); *Elementa E-a Sintakso*, 1924; *E-a Afiksaro*, 1914; *lernolibroj por rusoj*. Kunlaboris al *La E-isto*, *Ondo de E*, ktp.

(Mallongigita laŭ la artikolo de D. V. Ĉehoviĉ, LM, 1931, p: 118.)

Devoĝo de la Homo. Penso kaj agado. Dio kaj Popolo. De G. Mazzini, el la itala trad. M. Arabeno. 1922, 164 p. Eldonita en 10.000 e-roj per publika monkollektado kaj senpage dissendata. (Okaze de la kvindeka datreveno post morto de la tama batalanto por la libereco.)

Dia Regno. Organo de KELI, fond. en 1908; formato 28×22 cm. Red. Paul Hübner.

Diablidoj. Rakonto por la klasbatala junularo. Originale verkita de Barthelmess. 1928, 48 p. Aventuroj de la »ruĝaj pioniroj« dum ekskursoj. Facila stilo.

Diakonov P., ruso, d-ro, prof. de ĥirurgio ĉe la Moskva Univ. Nask. en 1855, mortis 21 dec. 1908. Dum junulaj jaroj malliberigita kaj ekzilita. En sia gazeto »Ĥirurgio« li faris resumojn en E. 26 sept. 1908 okazigis kunvenon de Moskvaj kuracistoj dediĉita al la prop. kaj praktika aplikado de E inter la kuracistoj.

Dibuk. Inter du mondoj. Teatraĵo de S. An-ski, el la juda trad. Lejzerowicz. 1927, 96 p. »Hebreaj moroj, tradicioj, kredoj kaj eĉ superstiĉoj. La traduko estas tre bona«. (G. S., E' 1927, p: 162.)

Dickinson (dikinsn) George, skoto, ekspoŝt oficisto. Nask. 10 junio 1865 en Haddington. E-istiĝis en 1910. 14 jarojn prez. kaj nun hon. prez. de grupo Leith.

Dietl (ditl) Wilhelm Ernst, aŭstrogermano, d-ro, ĉefstaba kuracisto en pensio. Nask. 23 dec. 1852 en Bösing ĉe Pressburg (tiam en Hungarujo). En 1887 ellernis Volapükon kaj estis sekr. de V. Asocio en Wien. E-isto

de 1908. Estis prez. de EG en Graz kaj en 1926 prez. de Aŭ. E Kongreso.

Dietterle (diterle) Johannes, germano, d-ro fil., prof., supera studkonsilisto en studejo por fraŭlinoj, Nask. 7 aŭg. 1866 en Chemnitz. Estis direktoro de la Saksa E Instituto. Fondis la E Instituton por la G Respubliko kaj estis ties direktoro. LK, estis vicprez. de la Akademio; komitatano de UEA; prez. de la UK en Nürnberg, 1923; prez. de la Interfoira Komisiono; gvidanto de la kunlaborado kun IALA; kunlaboranto de la firmo Hirt; gvidis E kursojn ĉe la radio-sendstacio en Leipzig ktp. Organizis tutmondan statistikon pri la E-istoj en 1928. Kunlaboranto de diversaj gazetoj. Verkoj: Goldschmidt-Thora: Bildotabuloj por la instruado de E, 1921; La Vendreda Klubo, 1921; Originala Verkaro de Z, 1929 (unu el la plej gravaj verkoj pri E-ismo); kelkaj prop. kaj gram. verkoj.

Diez Felikso, hispano, instr., prof. ĉe komerca universitato. Nask. 29 jul. 1889 en Villaviudas. Publikigis hispane diversajn lernolibrojn kaj multajn verkojn trad. el germana, rusa, franca kaj angla lingvoj. E-isto de 1906, L. K. de 1921. Instruis E-n en publikaj lernejoj, gvidis ĉiutagan E-an fakon en hispana ĵurnalo kaj »praktikan metodon« de E. Kunlaboris je L. M. kaj aliaj revuoj.

Disertacioj (por akiri doktoran gradon). Ili povas esti trispecaj: a, disertacio kun resumo de l' enhavo en E ĉe la fino de la kajero; b, la temo mem estas pri E, ekz. la lingvo kiel objekto de l' studo, ĝia utilo, socia signifo; c, la detaloj de la studobjekto estas ricevita per enketo dank' al E, per delegitoj de UEA, ktp. En UEA-Jarlibro 1930, p: 40, estas trovblaj aŭtoroj kaj titoloj de 6 tiaj disertacioj.

Diservoj. Katolikaj. La unua kat. diservo en E okazis dum la unua UK en 1905 en Boulogne sur Mer, en la preĝejo de S. Nikolao, al kiu estis invititaj ĉiuj kongresanoj, ankaŭ Z ĝin ĉeestis. Sed la episkopo de B. s. M. ankoraŭ ne permesis

prediki E-lingve. Dum la 2-a UK en Genève, pastro Peltier ricevis de Papo Pio X-a la aprobon al sia laboro, kaj dum la kat. diservo li la unuan fojon predikis E-lingve. Depost tiam ĉe ĉiu UK la katolikoj okazigis regule siajn diservojn, dum kiuj predikis en E diversnaciaj pastroj. En 1907 Richardson, belga, Frohns, germana; 1908 Kanoniko Pichot el Monaco; 1909 Bazilio kaj Sacher, hisp. Post la kongreso en Barcelono, 15 sept. 1909 Pro Marko Llirio en Montserrat. Hisp. predikis tre elokvente, post kio Pro Richardson per solena beno inaŭguris la standardon de IKUE. En 1911 Richardson kaj Parker, angla; 1912 J. Szurek, pola, 1913 J. Lajos, hung. Certe tre grava kat. diservo okazis 26 aŭg. 1913 en Bern, kiu estis funebra diservo pro la subita morto de Richardson, prez. de IKUE. Ankaŭ ĉi tiun diservon ĉeestis Z kun sia familio. En 1925 predikis Pro Carolfi, itala, 1927 Pro Cseh, hung., 1928 Font Giralt, hisp., 1929 Pro Holik, hung., 1930 Pro Gaffey, Irlando, 1931 d-ro Kukulko, pola, 1932 d-ro Christianell, Aŭstrujo, 1933 la ĉina franciskana monaĥo J. B. Kao.

Depost 1910 la kat. E-istoj dum siaj int. kongresoj ĉiam okazigis diservojn. Predikis i. a.: 1910 Richardson, 1911 Richardson kaj Parker, 1912 Parker kaj Bianchini, itala, 1913 Bianchini kaj Carolfi, 1920 (Hago) Pro Lutkie kaj Poell, ned., 1922 Meŝtan, Aŭstrujo, 1923 Mous. Giesswein, hung., 1924 Carolfi, 1926 Ramboux, franca kaj Carolfi, 1927 Font Giralt kaj Carolfi, 1928 F. Giralt kaj Verschure, ned., 1929 prof. Schmalbaug, Aŭstr., Poell, Ramboux, kaj F. Giralt, 1930 Ramboux kaj Kiglits (Ākos), hung.

Tre menciinde estas ankoraŭ, ke Pro Decoene, belga misiisto en la urbo Brandaro, Manitoba-ŝtato, Kanado, uzis praktike E-n en ĉiuj Diservoj inter siaj parohanoj el ĉ. 17 malsamaj lingvoj; li tie katehizis, predikis kaj administris la sakramentojn E-lingve. Same faris Pro Jubenville en Saint Félix, Kanado; kaj aliaj misiistoj en Hinujo.

Frato W. van ZON.

Laŭ la Konversacia Gazeto, (1931) la unua Diservo kun E-lingvaj kantoj okazis 26 okt. 1896 en la katolika preĝejo de Smolensk (Rusujo).

Protestantaj.

E ĝis nun nur private estis uzata en prot. Diservoj. Laŭ mia scio la unua prot. Diservo en E okazis en la 2-a UK en Genève, 1906. Predikis pastro Schneeberger. Sekvis en 1907 la Diservo dum la 3-a UK en Cambridge; predikis pastro Rust. Grandioza Diservo okazis en la 4-a UK en Dresden, kie laŭ tiamaj informoj preskaŭ 2000 personoj ĉeestis en la fama preĝejo »Kreuzkirche«. Oni prezentis la belegan oratorion de Schubert »La Ciopovo«, kiu estis tradukita en E. Predikis pastro Kühn. — En la pluaj kongresoj ĉiam okazis prot. Diservo. La LKK-j afable aranĝis ĝin kaj la ekleziaj komunumoj de la kongresurboj permesis la uzadon de la preĝejo. La Kristana E-ista Ligo Int. (KELI) dum la UK en Paris, 1932, decidis, ke estonte ĝi aranĝos la kongresajn prot. Diservojn sub propra respondeco. Tiu en la 25-a UK en Köln bone sukcesis; predikis pastro Koopmann, la ĥoro de la Blu-Kruc-Societo kantis du psalmojn en E. — Krom la kongresaj Diservoj okazis ankaŭ privataj, precipe en Anglujo, kie prot. E-istoj jam de 1907 aranĝis Diservojn.

P. HÜBNER.

Ekde 1909 en London okazas seninterrompe ĉiunonataj Diservoj. »La Diservo estas definitive kristana laŭ karaktero, sur la bazo de la Biblio kaj la Apostola Kredkonfeso; sed tute nesekta. La kondukanto, memorante, ke partoprenas ĉiun kun diversaj religiaj kredoj, celas trovi la aferojn komunajn, kaj eviti diskutonaskajn temojn.« La tuta Diservo okazas en E-a lingvo. Ĝin partoprenas homoj el multaj diversaj kristanaj sektoj, predikis eĉ romkatoliko. Ordinare ĉeestas nuntempe preskaŭ 100 personoj. Loko de la Diservo de kelkaj jaroj: la preĝejo St. Ethelburga, 72 Bishops-gate, E. C. 2. Sekr. de la Diserva Komitato: 1909—33 M. C. Butler.

Laŭ M. C. B.

Hebreaj. La unua hebrea Di-

servo dum UK okazis en 1912 en Kraków. Predikis Saphra. Sekvis pluaj Diservoj.

Dmitriev Vladimir, ruso, ing.-konstruisto. Nask. en 1870. Aliĝis al E en 1907, gvidis en Petrograd multajn kursojn. Li verkis E-R vortaron; Grafikajn figurojn de la kresko de ES-j kaj gazetaro. Kunverkis prop. verkon.

Dobravec F., financa inspektoro en Maribor (Jugosl.). Prop-isto. Verkis post la milito slovenan gramatikon de E kaj vortaron.

Döhler (döler) Walter, d-ro, germano. Laboris multe por E, speciale sur la radio-kampo. Verkis E kaj Radio, 1928, kunlaboris je Int. Sciencia Revuo, Wüster-Vortaro. L. K.

Dokumentoj de Esperanto. Kunmetita de A. Möbusz, 1921, 200 p. Informilo pri la historio kaj organizo de la E-a movado. Enhavo: Historio de L. I. de Leibniz ĝis la nuna tempo; Biografio de Z; La unua tempo de E en Germ.; Einstein; La unua E-ista gazeto; Hachette kaj E; La UK-j; Kongresparoladoj de Z; regularoj, leteroj ktp., kiuj havas dokumentan karakteron.

Dokumentoj de Komunismo, SAT, 1923, 132 p. Enhavo: K. Manifesto de Marx kaj Engels; Konstitucio de Rusa Soveta Respubliko; Programo de Rusa K. Partio; Manifesto de K. Internacio.

Domac Julio, kroato, d-ro kuracisto. Mortis en 1933. Prez. de ES en Zagreb, 1923—27. En 1924 red. de Konkordo. Bona parolanto.

Dombrovski, v. Dambrauskas.

Domènech (domenèç) Mas Artur, kataluno, libroteaisto, prot. de latina lingvo, kunred. ĉe sindikalistaj ĵurnaloj. Nask. 13 jul. 1878 en Barcelona. E-isto de 1914. Konstan'a kursgvidado. Estis prez. kaj sekr. de Int. Floraj Ludoj, sekr. de KEF, prez. de l' loka EG. Tri monatojn post sia E-igo li gajnis la naturan floron dum Fl. Ludoj. Depost tiu tempo (1914) li fariĝis flua kaj lerta E-poeto kaj gajnis ankoraŭ trifoje premion dum la Fl. Ludoj.

Domingues (domingiŝ) Carlos, brazilano, d-ro, advokato, prez. de BKE

depost 1923, vicprez. de BLE, ĉefdel. de UEA, red de Brazilo E-isto. Reprezentis la registaron ĉe la 18-a kaj 21-a UK-j. LK de 1932. Kunredaktas kompletan Portugalano E-vortaron. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Domo de Esperanto, societo en Paris por disvastigo de E. (v. Franĉujo.)

Domo de Homamo, v. Oomoto.

Don Juan. Komedio de Molière, el la franca trad. Boirac. 1906, 108 p. »La rakonto rememorigas al ni la scenon muzike prezentitan per la genio de Mozart. La mirinda fleksebleco de la lingvo vidiĝas per la diversaj interparoloj inter la kamparanoj, ktp.« (D. H. L., British E-ist, 1906, p: 101.)

Donker Hendrik Sierik, nederlandano, supera poŝtofiscisto. Nask. 25 febr. 1889 en Amsterdam. Estis sekr. de la NSE, reprezentanto de ILEPTO kaj estraron de loka grupo. Kompilis broŝuron N-lingvan Kial E-instruo en la unuagrada lernejo?

Dor Henri, sviso, d-ro, kuracisto. Nask. 4 okt. 1835, en Vevey, mortis 29 okt. 1912. Fama oftalmologo: li studis en dek Universitatoj de sep landoj; en 1866 vokita de la Berna Universitato, li direktis tie la instruadon de la oftalmologio. En 1876, vokita de Lyon-aj profesoroj, li fondis gravan senpagan oftalmologian klinikon, kiun li direktis ĝis sia morto. Li estis prez. de »Medicinaj Sciencoj«, ktp. — Sciencemulo, artemulo, li estis ankaŭ poligloto, flue parolis kaj skribis dekunu modernajn lingvojn, kaj legis la latinan kaj la grekan. En 1902, jam sesdek-sepjara, post parolado de Boirac en Lyon, li aliĝis al E, kaj estis unu el la unuaj membroj de la Lyonano grupo, baldaŭ li prezidis ĝin, poste li fariĝis vicprez. de SFPE, kaj rapide akiris nediskutatan aŭtoritaton. En 1908, kunfondinto de TEKA, kies prez. li restis ĝis la morto; li redaktis ĝian oficialan bultenon. Li propagandis per paroladoj kaj gazetartikoloj, kaj igis favoraj al E multajn scienculojn. Pro lia aĝo, lia boneco, la glorkrono de liaj blankaj haroj ĉirkaŭ nobla alta frunto, oni nomis

lin »la patriarko de la dua generacio de E-istoj«. LK, 1905. L. BASTIEN.

Dore Fernand, franco, fabrikisto de trikotajoj. Nask. 19 marto 1860 en Fontaineles-Grès (apud Troyes), mortis 7 febr. 1922 en Troyes. Fondis en 1920 la muzikan Konservatorion de Troyes. Prez. societojn turistajn kaj sportajn. Fondis en 1904 la grupon de T., kiun li prez. ĝis la morto. Multaj paroladoj en la regiono, kunlaboro en E gazetoj. Trad. kelkajn broŝurojn.

Döring Franz, germano, komercisto. Nask. 5 aŭg. 1889 en Helmstedt. E-isto de 1908. Organiza kaj instrua laboro en Berlin, de 1917 en Königsberg, de 1919 en Freiburg (Baden), kie li fondis novan grupon. Kursoj, ankaŭ por blinduloj. Tradukajoj en manuskripto. Liaj edzino kaj filino estas E-istoj.

Dottarelli Primo, italo. Nask. 1 dec. 1864 en Roma, mortis 6 dec. 1919. E-isto de 1905. Vigla kaj fervora prop.-isto. De 1905 konsulo, poste del. de UEA en Roma ĝis sia morto.

Dover. Havenurbo, banloko kaj fortikajo en Anglujo; 42.400 loĝantoj; loko (kune kun Calais) de la unua iom grava int. E-a kunveno. v. Calais.

Dratwer Isaj, hebreo, bakteriologo. Nask. 1 jan. 1905 en Warszawa. Fervora prop.-isto. Prez. de l'Akademia E Rondo. Sekr. de komitatoj postkongresaj en 1927 kaj 1931. Ofte aperigis artikolojn (leterojn) en HDE, P E-isto, k. a. Aparte eliris Noveloj el la rusa de Romanov, 1932.

Dreher Leopold, (pseudonimo: Leo Turno) hebreo, d-ro, advokato. Nask. 24 okt. 1896, loĝas en Krakow. Aktiva cionisto, multe verkis en la antikva hebrea lingvo. E-isto de 1911. En 1912 dum la UK en Kraków li jam estis ano de la organiza komitato. En 1918 li instigis al eldono de E-a Voĉo kaj estis ĝia red. dum kelkaj jaroj. Ano de la ekzekutiva komitato de PED. Lia unua tradukajo aperis (el la germana) en 1913 en Juna E-isto. Poste multaj aperis en P E-isto, E Voĉo, E Triumfonta, HDE, k.a. Li verkis ankaŭ prilingvajn studartikolojn. En 1922 aperigis kompletan lernolibron por poloj, (eliris jam 4 eldonoj),

en 1925 superan kurson de E, en 1931 anekdotaron »Studo per Rido«. Multaj kursoj. L. K. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Dresden. Urbo en Germanujo, ĉefurbo de Saksujo, 632.700 loĝantoj. — 4-a UK 17—22 aŭg. 1908, 1368 kongresanoj el 40 landoj; unua kunveno de UEA; E-teatraĵo kun famaj aktoroj.

Dresen (dresen) Helmi, estonino, oficistino. Nask. 4 jul. 1892 en Kolga. E-isto de 1912. Fond. membro kaj multjara estrarano de »Espero« en Tallinn, EAE kaj ETK. Ĉefdel. de UEA peranto de SAT. Kunred. de Informoj de EAE. Kunlaboranto de L M kaj aliaj gazetoj. Kun-aŭtoro de E-Estona Vortaro Vokoj kaj Estona Antologio. Depost la mondmilito »la animo de la E movado en Estonujo«, tra kies manoj iras la fadenoj de la E laboro. Gvidis multajn kursojn. L. K.

Dresen Hilda, (ps. Hido) estonino, radiotelegrafistino. Nask. 11 majo 1896 en Kolga, Harjumaa. E-isto de 1913. Kunlaboranto de L. M. Ektradukis en 1922. Si estas nia plej aktiva verkistino. Ŝiajn verstradukojn karakterizas instinkte radika ritma sento, riĉa rimtrova preteco, vivanteco de la lingvo, kaj ia individueca ĉarmo de l' esprimmaniero. Tamen kelkfoje sentigas ia stila rigideco, ia lingva malflekseblo en ŝiaj tradukoj. Ĉi tiu manko ne ĝenas en ŝiaj originalaj poemoj, kiuj plejparte aperis en L. M. En ili ekparolas la melankolio de l' malgajaj nordaj pejzaĝoj, melankolio, kies sincerecon kaj sancon pravas ĝuste la maloftaj, sed impetaj ek-ekjubiloj de l' vivĝojo kaj vivovolo. Pri ŝia vasta kulturo atestas ŝia plurlingva literatura orientiĝo. (Ŝi tradukis el la estona, liva, rusa, germana lingvoj.) Ŝiajn tradukojn ampleksas la jenaj volumoj: Marie Under: Elektitaj versoj (1929), J. Barbarus: Horizontoj (1931), Estona Antologio (1931), Estona Antologio (1932). TOTSCHÉ.

Dresen, Ernest, sovetiano, latvo, inĝeniero. Nask. 1892 en Liepaja-Li-

bau (Latvio), lernis en reallernejo en Kronštadt kaj en teknologia instituto en Petrogrado. En 1915—17 ferriko de rusa armeo, en 1918—21 okupis diversajn postenojn en Ruĝa armeo. En 1921—24 laboris en Centra ekzekutiva komitato de Sovetoj. De post 1924 laboras en scienca kampo — pri racia labororganizo kaj pri lingvistiko. En 1926—30 dir. de l' instituto de komunikado (poŝto, telegrafo, telefono, radio), poste vicdir. de trusto »Orgenergo«, speciala redaktoro de la eldono pri administrita tekniko, prof. de Moskva universitato kaj de aliaj teknikaj altlernejoj, estrarano de Sovetunia societo por kultur-rilatoj kun eksterlando (VOKS) k. a. E-isto de 1910. D. estis prez. de Peterburga Societo »Espero« 1917—19, unu el iniciatintoj de ESKI en 1919. Ĉe la 3-a Tutruslanda kongreso E-ista en Petrogrado 1921 li estis elektita prez. de Centra Komitato de SEU tiam fondita. De tiam senŝanĝa gvidanto kaj inspiranto de la tuta Sovetunia E movado. Aŭtoro de diversaj gravaj verkoj pri E: unika kaj plej kompleta Historio de la Mondolingvo, priskribanta ĉiujn konatajn projektojn de lingvo universala (1931); Analiza historio de E movado (1931); Skizoj pri teorio de E (1931); Zamenhof — bioideologia studo (1929); La vojoj de formiĝo kaj disvastiĝo de la lingvo int. (1929) k. a. De post 1929 LK kaj akademia korespondanto por rusa lingvo. N. NEKRASOV.

Droogendijk C. Ch., nederlandano. Mortis. Prop-isto en la provinco Zeeland. Laboris i. a. sukcese por E ĉe la Konsilantaro N. kontraŭ la milito kaj trad. por ĝi artikolojn en E gazetoj. Aŭtoro de E-aj kantoj.

Drudin (drüden) François, franco, borsakunaganto. Nask. 15 nov. 1866 en Riom (apud Clermont-Ferrand), mortis 3 okt. 1926 en Lyon. Dum preskaŭ 25 jaroj li batalis por E, propagandis precipe per tre multaj paroladoj en la Lyona regiono. Prez. de la »Amicale E-iste« de 1909 ĝis la morto, kaj de la Federacio E-ista Rodana, kiun li fondis en 1908.

Dua Libro. Eldonita de Z komence de 1888. Dato de la cenzura aprobo: 18 jan. 1888. Ĝi estis verkita nur en E kaj havis la jenan titolon: D-ro Esperanto. Dua Libro de l' lingvo internacia. Kajero n-ro 1, kosto 25 kopekoj. Varsovio 1888. Tiu ĉi broŝuro (50 p.) devis esti unua parto de libro, enhavonta ses kajerojn, aperontajn dumonate dum 1888. En la antaŭparolo (16 p.) la aŭtoro respondas publike al ĉiuj skribintoj, ne povante respondi aparte je diversaj demandoj, proponoj de reformoj en la lingvo ktp. Krome la libro enhavis tradukon de La ombro de Andersen, Popoldirojn, trad. de Hemza, Kanto de studentoj kaj tradukaĵojn el Heine de K. D. (l. Privat, l. p: 34—36. La tuta antaŭparolo en OV, p: 21—29.)

I. ŜIRJAEV.

Dubois (dübua) René, franco, komerca direktoro. Nask. 16 sept. 1886 en Saint-Amand-les-Eaux (apud Lille). En 1906 fondis E-grupon en tiu urbo, kaj en 1908 helpis fondi la Federacion de Norda Francujo. Redaktis kun Couteaux la revuon *Vekigo*. En 1921 estis unu el la reorganizintoj de la Federacio de la Pariza regiono. Li partoprenis en la fama »Verda Kato«. De 1920 sekr. de la Pariza grupo kaj red. de la monata *Paris-E*. Li helpis al la organizo de la X Kongreso en Paris, 1914. De 1925 franca reprezentanto en KR. Li redaktis en 1929 la konatan »Projekto Dubois«, kiu celis la unuecon de la movado, kunfondante en unu solan Asocion la dispacajn sendependajn organojn (Naciaj Societoj kaj UEA). Dum la Pariza Kongreso, la 4 aŭg. 1932, la KR adoptis laŭ lia propono la »Konvencion de Parizo«, kiu nuligis la kontrakton de Helsinki. La ĝenerala Estraro elektis Komisionon por redakti la novajn statutojn; D. estis elektita prez. Ĉar la novaj statutoj ne kontentigis ĉiujn faktorojn, alia konferenco okazis en Genève 22 majo 1933. Tie interkonsento estas subskribita, kiu estis la bazo de la interkonsento de Köln. En tiu kvarjara diskuto D. ĉiam energie partoprenis.

L. PASFIEN.

Duchochois (dūŝoŝua) Maurice, franco, direktoro de akvoglaciejoj Nask. 6 jun. 1862 en Boulogne-sur-Mer. Eksjuĝanto ĉe la komerca tribunalo en Boulogne, kaj ŝipekipisto por fiŝkaptado. Unu el la organizintoj de la unua UK, iniciatinto de la E-ista standardo (v.). Sur liaj ŝipoj flirtis je la unua fojo la E-ista flago. Prez. grupon en B.

Dueholm Anton Peder, dano, instruisto. Nask. 4 dec. 1882 en Sevel. Kiel junulo li vojaĝis multe. En 1910 komencis ellabori artan lingvon. La 4 dec. 1910 li fariĝis E-isto. Eldonis *E-D Vortaron*, 1912.

Dufrenne Jean, Baptiste Belfort, nederlandano, ĉefoficisto ĉe la poŝto. Nask. 7 jan. 1884 en Leiden. Ĉefdel. de Hepto, korespondanto kaj patrono de ICK. Faris prop. paroladojn kaj gvidis kursojn.

Du Majstro-noveloj de Th. Storm, el la germana trad. Heitmüller 1929, 158 p. »La unua: La blankĉevala rajdanto estas vere klasika, tipa norda novelo. Ĝi priskribas la heroan bataladon de la frizlandanoj kontraŭ la norda maro. La stilo estas tre konciza kaj sugestiva.« (Halka, Hungara Heroldo, 1930, n-ro 5.)

Du mil Novaj Vortoj, ĉerpitaj el la verkaro de d-ro L. Zamenhof, netroveblaj en la Universala Vortaro (v.) kun tradukoj en franca, angla, germana, hispana, itala, rusa kaj pola lingvoj. Kun referencoj montrantaj la lokon, kie ĉiu vorto troviĝas. *Kompilis Boulet*. 1908, XV kaj 72 p. »Oni ne povas konsideri kiel oficiala, kiel »deviga« ĉiun vorton de d-ro Z, kaj nia majstro mem protestis kontraŭ tiu teorio.« (Th. C., L. I. 1908, p: 482.)

Duobla akuzativo. Du rektaj komplementoj apud la sama verbo, ekz: »oni min sciigis gravan famon«. Ĝi estas gramatika eraro. KALOCSAY.

Duoblaj literoj. Z en la Fundamenta Vortaro ne faris vortojn kun DL-oj samaj; anstataŭ kolego, inteligenta li prenis kolego, inteligenta. Sed ĉi tiu utilisma principo nenie estas deklarita kiel regulo, kaj ankau Z mem uzis poste DL-ojn

en vortoj, kiuj transskribite unulitere estus samformaj kun vortoj jam ekzistantaj en la lingvo (brutto, netto, mokko, bullo, finno, villo).

Pri ĉi tiu demando okazis diskuto ankaŭ en la L. K. (Oficiala Gazeto, dec. 1911), kie Esselin protestis kontraŭ la vortoj villo, regatto, bullo, enkondukitaj en la Marista Terminaro. LK-anoj Nylén, Ellis, Villanueva, Boirac, Mybs, Inglada, Cart samopiniis kun Esselin, sed ne povis proponi taŭgajn vortojn. Kontraŭe Christaller, Evstifejeff, Cefeč, Wackrill kaj Grabowski voĉdonis por la DL. Evstifejeff opiniis: la DL-oj saĝe evitiĝas en la komuna vortaro, ĝuste pro tio povas servi kiel distingiloj de int. homonimoj. Villo, villa, villano estas pli oportunaj, ol vilao, vilaa, vilano. Wackrill same opiniis. Grabowski akcentis, ke pli bone estas sekvi la ekzemplon de Z kiu en siaj vortaroj ne kripligis ĉi tiujn int. vortojn per la senmotiva elimino de la DL.

KALOCSAY.

Dupuis (düpüi) Marcel, franco, inĝeniero de fervojoj. Nask. 25 febr. 1880 en Paris. Propagandas ĉefe sur la kampo de fervojoj kaj turismo per artikoloj, paroladoj, organizo de karavanoj, ktp. Vicprez. de la Pariza grupo. Ĝen. sekr. de ISAE.

Dürer, Albrecht. Lia vivo kaj el-ekto el liaj verkoj. Verkis F. Nüch-ter, trad. el la germana de kelkaj. 1911, 95 p. kaj 54 tabuloj kaj bildoj. Formato 33×26. Luksa, serioza eldonajo pri la fama mezepoka pentristo. Modela teksto. — Alia verko pri D. verkita de Koch, 1923 (?), 48 p. Dudekok bildoj pri liaj verkoj kun biografio kaj klarigo.

Durieux (dürjō) Firmin, franco, instruisto, lernejestro. Nask. 21 jan. 1857 en Bruille (apud Lille). Interis-igis ankaŭ pri pedagogio, stenografio, interhelpado. E-isto de 1898. Per sen-ĉesa klopodo li sukcesis konvinkisian inspektoron kaj organizi instruadon de E ĉe unuagradaj lernejoj, kun ekzameno kaj diplomo. Tiu provo, kiu daŭris ses jarojn, ĝis la mondmilito, kaj tre bone sukcesis (vidu Gautherot, »La question de la

langue int.«) kredeble la plej grava iam farita, restas kiel valora pruvo de la profito, kiun povas alporti la enkonduko de E en la lernejojn. En 1907, D. fondis kun kolegoj la Int. Asocion de Instruistoj kaj ĝian organon, la Int. Pedagogian Revuon, kaj estis ilia sekr. Multaj artikoloj en E-istaj gazetoj.

Durrant Ernest Donald, anglo, asekuristo. Nask. 24 jul. 1907 en Woodbridge. Okupas sin aparte pri nacigazeta propagando. Pro liaj klopodoj la angla Unio por la Ligo de Nacioj nun instigas la Ligon rekon-sideri la helpingvan demandon. Artikoloj en HDE.

Duval (düval) Maurice, franco, oficisto ĉe borsagento. Nask. 8 febr. 1904 en Paris. Propagandas precipe en la skoltaj kaj lernejoj medioj. Direktas la E-an fakon en la franca revuo por lernejoj »Les Heures Nouvelles«. Gvidas plurajn kursojn en gravaj lernejoj, kaj la perkorespondajn kursojn de l' »École Universelle.«

Duviard (düyjar) Ferdinand, franco, licea prof. Nask. 11 jun. 1889. Verkisto, romanisto. E-isto de 1905, skribis en multaj gazetoj: okupis sin pri junularo; kun Pichon fondis »Franca Federacio de junaj E-istoj« kaj redaktis: Juneco, 1909—10. Estis L K, tuj post la milito eksigis.

Duyos Sedó (dujos) Rafael, hispano, infanteria kolonelo. Nask. 27 apr. 1879, mortis antaŭnelonge. Manova E-isto, gvidis kursojn, verkis bonan gramatikon. Aŭtoro de Prozo kaj Verso (kun Inglada.)

Dzika 9. en Warszawa. 21 jarojn (1895—1916) loĝis tie Z kaj ĝi estis pilgrim-revo de ĉiuj E-istoj. Nuntempe la strato portas la nomon: »Ulica Dr. Ludwika Zamenhofa«. En tiu domo Z havis du loĝejojn. Sur la dua etaĝo estis lia privata loĝejo kaj sur la unua (identa) estis lia laborejo, kliniko. De ambaŭ loĝejoj la fenestroj eliras al la strato Pawia (la domo staras angule de Pawia). En la angulo de l' fronto ĉe Pawia flanko, apud la strata tabuleto, estas videbla bela marmora tabulo (100×70 cm.) kun kvinpintaj steloj kaj surskribo (pollingve): »En tiu domo loĝis

d-ro Ludwik Zamenhof, nask. 1859, mortis 1917, kreinto de la int. lingvo Esperanto. (E-lingve): Internacia Esperanta Postkongreso. Varsovio 9. VIII. 1931. Nuntempe la privata loĝejo — ekde 1916 — estas translok-

igita al str. Królewska 41, sed la kliniko funkcias ankoraŭ ĝis nun. Dum longa tempo la klinika loĝejo servis kiel kunveno kaj adreso de la Varsovia ES Konkordo.

E. WIESENFELD.



EANA: E-a Asocio de Norda Ameriko, v. Usono.

Eberler Otto, germano, advokato. Nask. 9 marto 1891 en Altusried. Komponisto de moderna danĉmuziko. Propagandisto en G kaj eksterlando.

EBI: E-a Biblioteko Int. (v.)

Eblogo: E-Blindulligo de Germanujo, v. Blinduloj kaj Germanujo.

Ebner Adolf, germano, d-ro med., kuracisto por kirurgio kaj ginekologio. Nask. 17 jan. 1875 en Königsberg. Fariĝis E-isto en 1897 per okaza legado de verketo de Trompeter pri E. Fondis grupon en K.

Edelmann-Barendregt (A. H. de Ruyter) estas en Amsterdam librejo, instalinta E-fakon, ĉiam plivastigantan.

Edinburgh. Ĉefurbo de Skotlando, 428.000 loĝantoj. — 18-a UK 1—7 aŭg. 1926, 960 kongresanoj el 36 landoj; solena dediĉado de la E-a Biblio en katedralo; altnivelaj koncertoj.

Edmonds A. J., anglo, anglikana pastro. Mortis 71-jara 19 jun. 1914 en Great Gransden. Pioniro en Britujo. Trad. *Hiawatha* de Longfellow, multon el Homeros, k. a., kaj partoprenis la tradukon de la *Nova Testamento*.

Ege Christian Ringstrup, dano, poliestro en Hobro. Nask. 16 apr. 1886. Membro de la ĉefestraro de la dana pacfederacio. Vigle laboris por int. infaninterŝanĝo, partoprenis en packongresoj en London, Genève kaj Budapeŝt, en kiuj li konvinkigis pri int. helplingvo. Fondis en 1932 klubojn en Hobro kaj Andrup, gvidante multajn kursojn. Vigle kaj tre efike laboras por E en ĉiuj pacifistaj grupoj.

Egiptujo. La unuaj pioniroj estis:

A. Piolet en Ismailia, Robert Laussac kaj René Japiot en Alexandria en 1901. La lasta en 1903 presis artikolojn en »La Correspondance Egyptienne illustrée.« En 1908 Fadie en Chartum gvidis E kursojn. En 1922 aperis prop. gazeto *Egipta E-isto*. Laŭ la Dietterle-statistiko en 1928 E-istoj estis en 6 urboj. Pri la progreso en la lastaj jaroj informas nin la ICK-raportoj. »La movado pli kaj pli atingas palpeblan formon, kiel i. a. pruvas la regule aperantaj prop. artikoloj en la enlanda gazetaro, precipe araba.« (1929). »La grupo de Port Said, konsilita de C. M. Cather, faris bonegan laboron. Pli kaj pli montriĝas la fruktoj de koresponda kurso en araba lingvo.« (1930). »Valoran instigon ricevis la laboro per la vizito de Scherer kaj kelkaj paroladoj. La apero de araba lernolibro de Amin-El-Mofti en Aleksandrio faciligis la instruadon.« (1932). »La ekzisto de araba lernolibro, de arabaj ŝlosiloj kaj flugfolioj faciligis senteble la laboron. Specialan meriton pro sia senlaca laboro akiris Tados Migalli en Fayoum, kiu fariĝis la efektiva gvidanto nuntempa. Ĉiama helpemo de Nassif Marus. Lastatempe la grupo de Kairo tre vigligis dank' al la kunlaboro de L. N. Newell, kiu organizis kurson laŭ Cseh-metodo.« (1933). UEA-del. en 1933 en Alexandria, (ankaŭ EG), Fayoum, Ismailia kaj Kafr Ghannam.

Eik Edgar, svedo-estono, juristo, vicnotario. Nask. 29 nov. 1902. Estrarano de EAE ktp., prez. de ia patronaro de EIE.

Einstein (ajnŝtajn) Leopold, germano, ĵurnalisto. Nask. 1834, mortis 8.

sept. 1890 en Nürnberg. Unu el la unuaj pioniroj. Z. skribis pri li, ke lia nomo devas esti enskribata per oraj literoj en la historio de E. Mondlingvano jam de longa tempo, li publikigis en 1885 traktajon G-e: Al la historio de la mondlingvaj provoj de Leibniz ĝis la nuntempo. Farigis volapükisto, kiun li propagandis per ĉ. 200 artikoloj. Sed ricevinte okaze en 1888 la Unuan Libron de Z, li tuj konvertiĝis al E. Li tuj komencis energian laboron, malgraŭ la atakoj de liaj iamaj volapükistaj amikoj. Liaj broŝuroj G-lingvaj kreis la fundamenton por la movado en G ĝuste en momento, kiam en Rusujo pro politikaj kaŭzoj ĝi estis preskaŭ sufokiĝanta. Sub lia influo la »Nürnberger Welt-sprachenverein«, fondita 18 febr. 1885 kiel centro de la volapükista movado, transiris en dec. 1888 al E. (L. O.V, p: 69—71.)

Eiselt (ajzlt) Josef, ĉeĥo, pens. gimnazia dir. »registara konsilisto«, loĝas en Praha. Nask. 12 marto 1858. Pioniro de E en Sarajevo. Tradukis la kroatan ŝlosilon, fondis en 1910 la klubon »La stelo Bosnia«, kies unua prez. li estis. Prez. de CAE de 1920 (fondiĝo) ĝis 1929. Verkis lernolibron E por ĉiu, 1930.

Ejdelman Boris Lvoviĉ, malnova rusa revoluciulo-bolŝeviko, kuracisto. Nask. 1867. En 1898 li estis prez. de la I-a kongreso de Rusa social-demokrata laborista partio. E-isto de 1927. En 1930 li publikigis, helpite de N. Nekrasov, broŝuron Sennaciismo kaj internaciismo, kiu estis akra kritiko kontraŭ sennaciismo de Lanti el vidpunkto de ortodoksa marksismo.

Eklumo en la Abismo. Verkis Barbusse, el la franca trad. E. l. s. e. 1923, 96 p. »La traduko de tiu alvoko al detruo de l' imperiismo kaj kapitalismo ne forprenis la energion de l' originalo. Akrega kritiko de l' nuna sociordo.« (G. S., E' 1923. p: 223.)

EKRELO (Eldon-Kooperativo por Revolucia E. Literaturo) fondiĝis en 1930 kiel memstara int. E-e'donejo kaj estas proksime ligita kun SEU. La siĝejo ĝis 1933. estis en Leipzig sub

gvido de W. Kampfrad kaj poste en Amsterdam adm. F. Wisser. Ekrelo eldonis precipe multajn broŝurojn pri aktualaj politikaj temoj, pri socialisma konstruado en USSR kaj pri anti-religia movado tie. Sed ne malpli gravaj estas ĝiaj primovadaj verkoj, la originalaj kaj tradukitaj romanoj kaj gramatikoj por rusoj, germanoj, francoj. Dum la mallonga tempo de sia ekzistado Ekrelo montriĝis tre aktiva, la nombro de la verkoj, eldonitaj de ĝi atingas 60 kaj la vendovaloro 51.—svfr. Nun Ekrelo entreprenas grandecan taskon: eldoni Elektitan Verkaron de Lenin en E-a traduko kaj 16 volumoj.

Ekspozicioj. Grava tereno de la propagando. 1. Estas ekspozicioj, kie oni montras nur E-ajojn; tiuj interesas kutime nur malgrandan publikon. 2. Pere de E oni kolektas aĵojn, apartenantajn al la sama fako, kaj tiel oni aranĝas fakan ekspozicion (ekz. gazetaro, orientaj religioj), kie E havas nur peran rolon. Tiaj ekspozicioj povas interesi almenaŭ parton de fakuloj. 3. Oni utiligas la grandajn aranĝaĵojn, kiel Foiroj, Mondekspozicioj kaj en ties kadro oni aranĝas ankaŭ E-ekspoziciojn; tie E havas kutime nur tre modestan rolon, sed inter la grandnombraj vizitantoj ĉiam troviĝas multegaj personoj, kiuj rigardas ankaŭ la elmontritaĵojn E-ajojn. Por helpi al la propagandistoj, UEA starigis apartan Ekspozician Servon, kiu vendas diversajn kolektojn de dokumentoj.

✕ **Ekstereŭropa karaktero de E-a morfologio.** »La gramatikaj finaĵoj elmontras tendencojn esti ne nur afiksoj, sed esti ankaŭ memstare uzebaj vortarelementoj. Tiamaniere entute starigas la principo, ke formale ĉiu E-lingvoelemento troviĝas en la vortaro kaj ke ĉiu speciala gramatika-morfologia regularo en E fakte eĉ ne necesas. Cion difinas la vortaro kaj la senco-ideoj atribuataj al la vort-elementoj en la vortaro. Tia morfologia strukturo de E estas tre parenca al lingvoj malproksim-orientaj monosilabaj (ĉina) kaj speciale al la lingvoj aglutinaj (turktataraj). Ne nur sufiksoj kaj prefiksoj, sed ankaŭ la tuta afiksaro necesas por deklinado kaj konjugacio—praktike povas esti konsiderata kiel memstaraj,

ne ŝanĝeblaj vort-elementoj, kies kuniĝo ĉiam difinas la logikan sencon de vorto kunmetita. Speciale la azianoj preferas tiun econ de E kaj ŝatas la esprimojn similajn al vagonarhaltigilo anstataŭ bremsilo. Tiu karaktero de E cetere pruvas, ke E estante laŭ vortaro lingvo okcident-eŭropa kaj roman-devena, samtempe laŭ sia strukturo pli similas la lingvojn ekster-eŭropajn. Konservinte homogenecon (samformecon) de la vortaro, ĝi sukcesis adapti tiun vortaron al la lingvostrukturaj tradicioj ekster-eŭropaj. Do E estas iusence lingvo efektive internacie, interlingve farita.« v. Drezen, Skizoj. v. Aglutina karaktero de E. Drezen, Skizoj, p: 59.

Ekström Ilmari, finno, elektro-ing. en Turku. Nask. 7 jan. 1890 en Pikkio. E-isto de 1907. Prez. de la loka grupo. Tradukis: Lea, teatraĵo de Kivi, 1920.

Ekzamenoj. Jam ĉ. 1900 SPPE en Francujo aranĝis E-ekzamenojn kaj unu el la ĉefaj celoj de Int. Instituto de E estis la organizo de ekzamenoj. Dum la 5-a UK en 1909 la Instituto aranĝis ekzamenojn sub kontrolo de Cart, Corret, Marie Hankel pri gramatiko, Ostrovski, S. Meyer, Kühnl pri literaturo, Hodler kaj Rousseau pri historio kaj organizo, Mann, Blaise kaj Privat (la fondinto de la Instituto) pri la instruaj metodoj. La Int. Instituto ne daŭrigis sian agadon post la milito, do nuntempe ne funkcias ekzamena komitato kun int. karaktero, nur la Cseh-Instituto faris kelkajn paŝojn tiurilate. Sed kreiĝis ekzamenaj komitatoj en ĉiuj landoj, kie E atingis seriozan progreson. En Aŭstrujo kaj Ĉeĥoslovakujo la komitatoj estas ŝtate komisitaj. La ekzameno eĉ sen oficiala karaktero estas celkonscie aranĝita en Britujo, Nederlando, Estonujo, Germanujo ktp., kaj helpas plialtigi la nivelon de la E-istaro. v. detalojn en la laŭlandaj artikoloj.

Ekzercaro de la lingvo int. E. eld. de Z en 1894, Warszawa, 43 p., 7-a eld. 1910, 55 p. La sola plena lernolibro de E, verkita de Z. Ĝi konsistas el 42 ekzercoj, el kiuj la kvar unuaj instruas pri la ĝusta legado (alfabeto, akcento), la ceteraj prezentas gradigitajn E tekstojn (apartaj frazoj kaj

fabelo La Feino); al ĉiu ekzerco estas aldonita kvinlingva komentario klariganta ĉiun novan vorton kaj ĉiun gramatikan regulon. En 1905 ĝi konsistigis la duan parton de Fundamento de E (v.), do ĝi fariĝis netuŝebla. M. SIDLOVSKAJA.

ELA: E-ista Literatura Asocio. v. **Elektitaj Fabeloj** de Grimm, el la germana trad. Kabe. 1906, 199 p. »Pro simpleco kaj boneco de stilo, intereso de materialo, kaj preskaŭ nesto de preseraĵoj, ĝi estas ideala legaĵo por niaj kursoj.« (M. C. B., British E-ist, 1907, p: 71.)

Elektitaj Noveloj de Baekelmans, el la flandra trad. Jan van Schoor, 1931, 84 p. »Ĉiu novelo de B. respegulas al ni la vivon de grizaj, ĉiutagaj homoj, vivantaj preskaŭ ĉiuj en iu antaŭurbo de Antverpeno. Generale la stilo de la tradukoj estas bona.« (Totsche, L. M. 1931, p: 198.)

Elektitaj Noveloj de Turgenjev, el la rusa trad. A. Mexin. 1923, 81 p. »Montra de la rusa popola animo, ĝia subcara socia stato, ĝiaj superstiĉoj.« (G. S., E, 1923, p: 183.)

Elektitaj Poemoj de Heine, el la germana trad. Zanoni. 1914, 33 p., dua eld. 1920, 47 p. »Ofte kritikita, sed tamen vere granda poeto. Dudeko da mallongaj aŭ pli ampleksaj poeziaĵoj. Fidela laboro.« (G. S., E, 1921, p: 118.)

Elektitaj Prozajoj de Heine, el la germana trad. Zanoni 1930, 87 p. Lirika prozaĵo. »En la animoj de la poeto kaj tradukinto egalsonne fluas harmonio inter lingvo-beleco kaj versoritmeco. Zanonajoj ne mankas en la traduko.« (Butin, H D E, 1930 n-ro 13.)

Elektitaj Versaĵoj de Marie Under, el la estona trad. Hilda Dresen. 1929, 94 p. »Tre lerte la tradukinto konservis la ritmon kaj harmonion de la estona teksto. Unu el la juĝantoj opinias, ke tia laboro ne malpli valoras, ol niaj plej bonaj versaĵoj en E-a lingvo.« (Akademia Raporto, 1930.)

Eleno Vinfero. Ps. de L. N. Newell-Eliot (eljot) Ralph, anglo, solicitoro. Nask. 12 apr. 1879 en Plymouth, mortis 28 marto 1926 en Lausanne (Svislando). En 1916—19 kasisto en

Francojo de la Kvakera Komitato por helpo al la Militviktimoj. Unua prez. de Kvakera E Societo. Tradukis anglan Vivo de Z (Privat). 1931.

El la Camera Obscura. De Hildebrand. el la ho'anda trad. Mes. 1923, 64 p. »Tri rove'oj. Traduko bona kaj flua.« (LM, 1923, p: 160.)

El la Infima Libro de la Verd-urbaj E-istoj. Verkis Atanasov. 1927, 72 p. »Rakontoj aŭ scenetoj pri la ĉegrupa vivo. La lingvo estas tre bona, la humoro ofte tikle agrabla.« (G. S., 'E', 1928, p: 8.)

El la Skizlibro. De W. Irving, el la angla trad. H. L. Elvin. 1924, 65 p. »Kvar rakontoj, laŭ romantika iom malnova modo, sed tamen tre plaĉaj, kaj tradukataj en facila fluanta lingvo.« (G. S., 'E', 1924, p: 19S.)

Ellerbeck (clerbek) Leopold, germano, ministeria konsilisto. Nask. 14 jan. 1872 en Bromberg. LK. Verkis lernolibron, 1928.

Ellersiek (clerzik) Friedrich Wilhelm (ps: Argus; Eko, k. a.), germano, eldonisto kaj redaktoro. Nask. 2 jun. 1880 en Calvörde. Ĉefe E eldonisto de 1909. Red. de G E-isto kaj E Praktiko. LK. Ĉefo de vojaĝoficejo Transmondo-Reisedienst. Praktike uzis E-n ankaŭ por aranĝo de ĉiujaraj karavanoj al UK. Verkis: Argus: Pro kio? Originala romano, 1921. Multaj originalaj artikoloj kaj tradukaĵoj en siaj gazetoj. Babiladoj en E Praktiko.

Elliott (eljot) Michael J., anglo, metodista pastro, d-ro teol. Nask. 28 okt. 1852 en Carlisle. Ricevis ateston de Z mem en la unuaj tagoj. Ĉeestis la UK en Boulogne, 1905. Partoprenis la kontroladon de la trad. de Malnova Testamento.

Ellis Ethelmer, anglo, (ps. Ben Elmy). Nask. 15 marto 1838, mortis 3 marto 1906. Pioniro en Britujo. Tradukis multe da poemoj E-en, inter ili La Princino de Tennyson.

Ellis (elis) John, anglo, sollicitoro. Nask. 1863 (?), mortis 21 marto 1923 en Keighley. Okupis multajn oficojn en movadoj muzika, ŝakluda,

abstinenca. Pioniro de E en Britujo, kunlabore kun Joseph Rhodes. Unua sekr. de la pionira E-a angla grupo de Keighley (1902). LK.

El Parnaso de Popoloj. Poemoj originalaj kaj tradukaĵoj el 33 lingvoj, de Grabowski, 1913, 228 p. »G. majstre pravas, ke E kapablas liveri bonnegajn rimajn tradukojn el plej diversaj lingvoj. Li preskaŭ ĉiam elektis poemojn, kies valoro fakte meritas diskonigon per nia ĉien sonanta int. lingvo. Li pravigas sian famon ankaŭ per originalaj versaĵoj, kiujn li aligis al sia multvalora poemaro.« (Valc, Germana E-isto, 1914, B. p: 13.) Gr. aperigis en 1921 supplementon al la poemaro sub titolo Postrikolto, 24 p.

Elparolo de E. La elparolo en E estas fonetika, t. e. al unu litero respondas unu sono kaj reciproke. Tamen ĉi tiu principo ne estas absoluta.

Ĉe la konsonantoj oni devas zorge atenti pri la klara prononco, kaj ne konfuzi la konsonantojn voĉajn (b, d, g, ĝ, j, v, z) kun la respektivaj senvoĉaj (p, t, k, ĉ, ŝ, f, s). Tamen, ĉe la renkontiĝo de konsonantoj voĉa kaj senvoĉa, estas neevitebla, precipe en rapida parolo, la sonkonformiĝo de unu el ili; ekzemple: ekdanci (egdanci), okdek (ogdek), ekzisti (egzisti aŭ eksisti).

Ĉe la vokaloj oni havas diferencojn laŭ longo kaj fermiteco. La akcentaj vokaloj estas iom pli longaj kaj iom pli malfermitaj; ekzemple en ama la unua a estas pli longa kaj pli malfermita ol la dua. Tio estas tute natura fenomeno, ĉar sur akcenta vokalo oni emas pli longe ripozi, kaj aliflanke longan vokalon oni nevole prononcas iom pli malferme. Sed se la akcentan vokalon sekvas pli ol unu konsonanto, la longeco estas donita jam per la konsonantoj mem, do la vokalo restas mallonga (kaj sekve ankaŭ fermita); ekzemple en grando la a estas pli mallonga ol en amo, kvankam la silabo and estas same longa, kiel la silabo am. Krome ekzistas vortoj (mia, via, lia, ŝia, ĝia, nia; ili; unu, apud, super; do pronomoj kaj prepozicioj), kies akcenta vokalo estas

prononcata mallonge; ĉi tiuj estas la duonakcentaj vortoj, aŭ enklitikoj; se ili sekvas en versoj akcentan vokalon senpere, ili tute perdas sian akcenton, kaj estiĝas ŝvebo (v. Ritmo.)

Ni do havas en E vokalojn akcentajn longajn (amo, bela) kaj mallongajn (granda, mia, ili).

La senakcentaj vokaloj estas mallongaj. Sola escepto fariĝas, se en kunmetita vorto apudiĝas du akcentoj. Tiakaze la akcento de la unua vorto perdiĝas, sed ĝi estas markita per la longigo de la vokalo; ekzemple en diservo la silabo di estas senakcenta, sed longa. Ĉe kelkaj ofte uzataj vortoj tamen forviŝiĝas ĉi tiu distingo ekzemple en la vorto aliloke la „i“ prononciĝas mallonge.

Ĉi tiu prononcmankio estas ne apriorie fiksita, sed ĝi estiĝis kiel rezulto de evoluo. Ĝi ne estas ankoraŭ senmanke obeata, sed la diverĝoj estas okazaj kaj ŝajnas esti influitaj sole de naciaj elparolkutimoj. La sola unueca sistemo, starigebla per la zorga komparado de la elparolo de l' diversnaciaj E-istoj, estas la supre skizita prononcmankio.

Literaturo: Privat: Historio de E. p: 68. Eugen Wüster (Germ. E-isto, jun. 1923); Karl Minor (E-Deutsches Handwörterbuch, p: 195); Paul Nylén (Sonoj kaj vortoj de E. 1930); Krysta (Pri prononcado en E; 1931); L. Thomson (L. M. 1931. p: 121); Paul Nylén (L. M. 1931. p: 197); Bulthuis (L. M. 1931. p: 227); Kalocsay: (L. M. 1931. p: 14, 121, 197, 227, Lingvo Stilo Formo p: 116); Totsche (De paĝo al paĝo, p: 83), Waringhien (Parnasa Gvidlibro, p: 17). **KALOCSAY.** **Elski** Wiktor ps. de Braun St. Z. (v.)

Elten Eduard, germano, lernejestro. Nask. 5 dec. 1849. Studinte natursciencan kaj anglan lingvon, li fariĝis estro de privata lernejo en Bockenem, 1878—1909. En la du jardekoj, kiam li vivis pensiita, li dediĉis sian tutan tempon al E. Dumviva membro de UEA. Propagandante ĉie kaj ĉiam kaj gvidante multajn kursojn, li malavare oferis ankaŭ la lastan reston

de sia havaĵo, restinta al li post la financa katastrofo en G.

Eltschkner (elĉkner) Antonin, d-ro teol., ĉeĥo, episkopo en Praha, titola episkopo de Zephirio. Nask. 4 jun. 1880 en Polička. E-isto de 1924. Prez. de Ligo de katolikaj E-istoj en Ĉ. Depost 1925 ano de E-a sekcio de l' »Katolika Konsilantaro«.

Elzet: ps. de Leono Zamenhof. (v.)

Enciklopedia Vortaro Esperanta. Kun klarigoj en E kaj franca traduko. Verkis Verax kun la kontrolo de specialistoj. 1910, XIX kaj 249 p. »Pli ol 12000 vortoj de ĉiuj sciencoj, artoj, metioj estas tre precize difinitaj en E. Ĉiu trovos en ĝi ĉiujn necesajn terminojn por esprimi siajn pensojn kun klareco en iu ajn fako de la homaj konoj. Ĝi estos la gvidlibro nepre necesa de tiuj, kiuj deziras funde scii E-n.« (Laŭ Sciencia Gazeto, 1912.)

Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana. Verkis Eugen Wüster. Eld. Hirt. Ĝis 1933 aperis kvar volumoj ĝis »Korno«. »La verko ne estas simpla vortaro, ĝi estas samtempe ĝisfunde detala prilaboro de la tuta, precipe de la Z-a lingvo-uzo: vortkunmetoj, esprimtormoj, sentencoj, proverboj, ĉiaflanka uzo de ĉiu vorto estas klare difinita kaj klarigita plejparte per ekzemploj, tiel ke oni tute ne devas scii la germanan lingvon por povi tre bone utiligi la vortaron. La tuta lingva trezoro, la tuta prilingva vivo-verko de Z, kiu ne konsistas nur el la kruda vortmaterialo, sed ankaŭ el la multflanka uzo, delikata nuancigo de la vortoj, estas tie ĉi prezentita ekzakte kaj detale. Kaj ĉe ĉiu vorto, esprimo, »suka« frazo, sentencmaniera diro oni trovas la indikon de la Z-a trovloko. La ampleksecon montru, ke la vorto kapo okupas pli ol sep dense presitajn kolonojn. Por vortaristoj la verko estas nemalhavebla fonto, por verkistoj ĝi estas neelĉerpebla trezoro, por literaturamantoj ĝi estas kvazaŭ plej supera kurso, instruanta vere ĝui niajn ĉefverkojn beletristikajn.« (Kopar, L. M. 1931, p: 15.)

Enciklopedio de E. estis kelkfoje pli frue iniciatata antaŭ ol realigi la

nuna eldono. En 1913 P. Stojan proponis Universalan Slipan Enciklopedion (USE), kiu laŭ lia ideo povus esti daŭre eldonata per apartaj slipoj por ĉiu temo. Samtempe estis eldonitaj 5 unuaj slipoj (N1—Slipa enciklopedio kaj ĝia estonteco, N2—Kinematika teorio pri la tempo, N3—Himno »Espero«, N4—Int. transkribo de propraj nomoj kaj NIOI—Kunveno, poemo de L. Levenzon.) En 1917 V. Ŝmurlo eldonis en Petrograd Universalan alfabetan nomaron-adresaron »Ariadna fadeno« (ANA) ĉefe kun nuraj referencoj kiel »unuan p. ovon de inciklopedie'o de l'esperantismo kun firma kredo ke el tiu... semo kreskos grandega arbo de l' E. Universala Enciklopedio.« La unuaj paĝoj 1—88 de ANA, presigis en Riga, pro militaj cirkonstancoj la sekvaj paĝoj de la libro aperis en malpli granda amplekso kaj nur de post la vorto »JE«, kun enhavo tre malabunda kaj skemeca. N. NEKRASOV.

En Danĝero. Teatraĵo, originale verkita en versoj de R. Unterman. 1911, 96 p. »La lingvan stilon ni trovas meze bona, sed la aŭtoro ne ĉiam uzas vortojn tre ĝuste.« (British E-ist, 1911, p. 214.)

Endér Franciszek, polo, hemiisto (produktado de fruktovinoj.) Nask. 26 dec. 1858 en distrikto Czortków. Antaŭe Volapükisto, poste sub influo de Grabowski, Kabe k. a. fariĝis E-isto kaj fondis filion de PES en Łódź dum 1908, kies prez. li estis multajn jarojn. Trad. Ama Bileto de Balucki kaj A. B. C. de Orzeszko.

Eneid. Epopeo de Virgilius, trad. el la latina Vallienne. 1906, 272 p. »Ĉiu verso estas agrable, kaj preskaŭ laŭvorte tradukita.« (Th. C., L. I. 1907, p. 84.) V. alian opinion en biografio de Vallienne.

Engholm Stellan, svedo, popollerneja instruisto. Nask. 1899 en Stockholm. Konatiĝis kun E en 1920, sed li iĝis aktiva E-isto nur en 1927. Kunlaboranto de L. M. Per sia unua romano Al Toronto (1930) li tuj akiris popularecon. Al la eterna temo, la juneca amo, li sciis doni individuec apartkarakteran prilaboron. Kvankam la libron pezigas balastaj teoriaĵoj, la poezi-inspira sugesto de la vizio pri

la amo ekkaptas la leganton. Lia dua romano Homoj sur la Tero (1932) gajnis la premion de la romankonkurso de L. M. en 1931. La temo de ĉi tiu libro estas la vivo de bienuloj, diversvojjaj sortoj, kiujn kun-kroĉas la ĉefheroo: la Tero. Sobra, kelkfoje tropreciza realismo, profundsonda psikologio, pura stilo, senriproĉa lingvo forgesigas la mankojn de la libro: la malriĉon de okazajoj, la tro surtere irantan fantazon. La figuroj de E. havas veran karnon kaj sangon, eĉ se la kvanto de la sango ŝajnas iom malmulta. Li pruviĝis talenta verstradukisto en siaj tradukaĵoj aperintaj en L. M. Liajn prozajn tradukojn karakterizas klara, flua stilo; la plej gravaj: Per balono al la Poluso (la Andrée-libro, 1930) Gösta Berling de Lagerlöf.

TOTSCHÉ.

Engst Josef, germano, instr. de komerco. Nask. 28 febr. 1889 en Tiefenhülen. E-isto de 1911. Prop. precipe en instruistaj rondoĵ; 1926—29 en la komerca univ. Mannheim.

En la Fino de la Mondo. Rakonto de Tuglas, el la estona trad. Sep-pik, 1924, 56 p. »Libro de giganta kaj transmonda fantazio, libro de premaj kaj spirretenaj efektoj, potenco, mistera, katenanta, neforgesebla.« (Kopar, L. M. 1924, p. 76.)

En la mondon venis nova sento — la komenca verso de La Espero. (v.)

En Okcidento Nenio Nova. Romano de E. M. Remarque, el la germana trad. de kvar. 252 p. Plej granda libro-sukceso post la milito. »La promesita objektiveco dronas en la rememoroj pri la milito kaj la verko prezentas elokventan akuzon, konfesion. La sangaj epizodoj, la draŝtaj scenoj, la lirikaj meditadoj efikas nur tie kaj sole tiel, kien kaj kiel la majstra plumo de la aŭtoro metis ilin.« (Baghy, Hungara Heroldo, 1930, n-ro 3.)

En Rusujo per Esperanto. Originale verkita de A. Rivier. 1911, 130 p. Interesaj priskriboj pri la antaŭmilitaj rusaj cirkonstancoj.

En Svislando. Kvin rakontoj de svisaj aŭtoroj. Trad. E. Ramo 1908, 104 p., kun ilustraĵoj. »Trate elektitaj

rakontoj, tradukitaj en la plej bona, pura kaj klasika E-a stilo.» (P. C., L 1, 1909, p: 333.)

Entombigo de la Majstro. Okazis lunde 16 apr. 1917 el la loĝejo ĉe Krolewska 41. (v.) La funebra ceremonio okazis en tre modestaj kadroj. Estis mondilito, Warszawa estis okupita de la germanoj, do ne povis alveni reprezentantoj el aliaj landoj. Venis nur la personaj konatoj, familiekaj samideanoj el W. Entute eble 150 personoj, el kiuj la plejparto iris antaŭ la veturilo kiel delegitaroj kun 3 florkronoj. Malfermis la procesion la unua florkrono, en la nomo de ĉiuj E-istoj en Polujo, portita de E. Wiesenfeld. La dua, portita de A. Oberrotman, estis en la nomo de UEA. La trian nome de ĉiuj germanaj E-istoj portis majoro von Neubarth, tiutempa havenkomandanto en W. Krom tio akompanis la veturilon Grabowski, Kabe, Belmont, k. a. El la familio sekvis: la vidvino, la filo Adamo kaj filino Lidja. (La alia filino estis tiam en Ruslando.) La procesio iris tra multaj stratoj de W., i. a. ankaŭ tra strato Dzika (v.), kie antaŭ n-ro 9 oni haltis. Sur la tombejo estis jam pli multaj homoj; kelkaj aliĝis ĉe str. Dzika, aliaj venis senpere al la tombejo. Post ĉiuj religiaj ceremonioj, plej solenaj, oni starigis tribunon, sur kiu adiaŭis la mortinton: Neubarth (nome de la germanaj E-istoj), Leo Belmont (polaj E-istoj) kaj Grabowski (tutmonda E-istaro). Poste en la sama ordo la procesio iris al la tombejo. La ceremonio daŭris kelkajn horojn kaj estis finita per »La Espero«, kantita de la E-istaro. Kelkajn tagojn poste la kinematografejo »Filharmonio« en W. montris filmon pri la tuta ceremonio. E. WIESENFELD.

EPC. v. The Esperanto Publishing Company Limited.

Epstein (Epŝtajn) Felix, germano, bankoficisto. Nask. 3 sept. 1882 en Hamburg. Bibliofilo, kolektanto de antikvaj libroj, studas la historion de la mondlingva movado precipe en la meza epoko. Ano de la fako fremdultrafika de GEA.

Eriksson Bernhard (ps. BEN), svedo, presejo-posedanto en Stockholm. Nask. 21 sept. 1890. Estrarano de SEF

1930—31, prez. de E Distrikto de Dalekarlio 1922—27 kaj de EG Stockholm de post 1929. Redaktanto de Svenska E Tidningen La Espero de jan. 1928. Presis de 1925-ĉiujn E-verkojn aperigitajn de Eldona Societo Esperanto.

Eriksson Ernst Gustaf Eugen, svedo, fervojficisto, estrarano de la Sveda Fervojista Sindikato. Ano de la dua ĉambro de la parlamento. Nask. 10 feb. 1881 en Vittinge. E-isto de 1901. Estrarano de la SLEA kaj aliaj societoj E-istaj. Kunlaboras al Sveda Laborista E-isto ktp. Trad. kun Johansson La lab. E-ismo de Lanti al la sveda kaj verkis kun la sama gramatikan parton en sveda lingvo al lernolibro de L. Puff. Artikoloj, paroladoj en la parlamento por E. Unu el la plej malavaraĵ subtenantoj de diversaj organizaĵoj.

Erjuŝin Aleksandro, ruso, telegrafisto. Nask. 1901 en Holmogori (norda Ruslando). E-isto de 1926. Tre aktiva prop-isto de E en Arhangel'sk. Gvidanto de int. E-korespondado ĉe redakcio de tiea tagjurnalo »Pravda Severa«. Membro de CK SEU de post 1931. En 1932 aperigis rimarkindan ruslingvan broŝuron pri sperto de sia int. E-korespondado.

Ernits Peeter, estono, instruisto. Nask. 2 marto 1879 en Tartumaa. Funkciis kiel forestro. Fondinto de »E-ista Mondo« en Valga. Multaj artikoloj pri E, estonlingva prop. broŝuro, kursoj en Valga.

Eroŝenko Vasilij, ruso. Malgraŭ sia blindeco, li multe vojaĝis tra la mondo per helpo de E. En 1912 li entreprenis sian unuan E-vojaĝon al Britlando, kie li lernis en instituto por blinduloj. En printempo 1915 E. venis Japanlandon kaj studis masaĝon ĉe blindula lernejo en Tokio. Tie li ageme propagandis E-n inter la blindaj studentoj. Post du jaroj li vojaĝis Siamon kaj fondis tie blindulan lernejon. Transveturante Hindujon, li estis tie malliberigita kaj poste elpelita kiel rusa bolŝeviko. En somero 1919 li forkuris tra ŝanhajo denove al Japanlando. Bone posedante japanan lingvon, E. verkis en tiu lingvo multajn rakontojn por geknaboj kaj tiel tre

famiĝis inter la progresema japana literaturistaro. La 1 majo 1921 pro partopreno en laborista demonstracio federacio E. estis arestita kaj baldaŭ ricevis elpelordonon. Tiam li venis Ĉinlandon kaj en 1922 prelegis lekci-ojn pri rusa literaturo kaj aliaj temoj en Pekina universitato kaj edukista kolegio por virinoj. El originalaj verkoj de Eroŝenko aperis: *Turo por fali*; *Unu paĝeto el mia lerneja vivo*, 1923; kaj *Gemo de unu sojeca animo*. En 1923 ĉe la UK en Nürnberg li gajnis unuan premion en konkurso por la plej bona prononco de E, deklaminte sian originan poemon »Ciganino«. La verkoj de E. ĉarmas per sia treege simpla, sincera, iom naŭva kaj sentimentala enhavo. Lastatempe E. multe propagandis E-n en Sovetunia Societo de blinduloj en Moskva.

Eska; ps. de Karolczyk.

Esenco kaj Estonteco de la ideo de Lingvo Int. Riĉe argumentita, grava traktajo de „Z” aperinta unue en Fundamenta Krestomatio, represita en la OV, p. 276—312.

ESKI E-a sekcio de III Komunist Internacio, rondita en Samara (Ruslando) en 1919 laŭ iniciato de Oĥtoviĉ (Ort Sunnam), E. Drezen kaj S. Hajdovski (Peĉenego). ESKI publikigis respektivan deklaron pri lingvo int. laŭ komunist vidpunkto, statuton kaj kelkajn aliajn eldonaĵojn. Laŭ indiko de superaj komunistpartiaj instancoj, ke povas ekzisti nur landteritoriaj sekcioj de Komintern, ESKI estis en 1921 reorganizata en Moskvo kiel E-ista Komunist Internacio kaj baldaŭ post tio, en fino de 1921, tute fermita (ĉar laŭ principoj de komunist agado ne devas ekzisti apartaj malvastaj kom. organizaĵoj, kiuj tiamaniere forbaras sin de la senpartia amaso). Aperis po unu numero: »Eskiano«-organo de Centra komitato ESKI (Kronŝtadt, sept. 1921) kaj du Inform-bultenoj de ESKI-komitatoj en Kazan (jul. 1920) kaj Nijni-Novgorod (mar-to 1921). Okazis du malgrandaj konferencoj de ESKI en N.-Novgorod kaj Petrograd dum la III Tutruslanda kongreso E-ista. En aliaj landoj fondiĝis nur ESKI-grupo ĉe ruĝarmeaj

militkaptitoj en Strzalków (Pollando). v. Komunist Internacio.

N. NEKRASOV.

Esperanta Biblioteko Internacia. Kolekto de originaloj kaj tradukoj de diversnaciaj E-istoj. Formato 14×10 cm. Eld.: Möller kaj Borel, poste Adler kaj Borel, fine Ellersiek kaj Borel (Berlin). La unua n-ro estis »Lego-libreto« de Borel, 1909, 44 p. Ĝis nun aperis 33 n-roj.

Esperanta Evolvo. Red. kaj eld. H. Sentis en Grenoble. Jan. 1911—komenco de la milito, organo de grupo de progresemaj E-istoj. Ĝi tute lojale kaj sen akreco pritraktis la evoluon de E laŭ latina vidpunkto. Laŭ BIL aperis 48 kajeroj kun 358 p. 27×22. Post la milito Sentis daŭrigis EE per okazaj kritikoj de artikoloj kaj esprimoj en E-aj gazetoj kaj libroj. P. TARNOW.

Esperanta Legolibro. Kunmetis B. kaj E. Migliorini. 1925, 144 p. Legajoj prenitaj ĉefe el la verkoj de bonaj E-istaj verkistoj. Partoj: Tra la Vivo; Tra la lingvo; Tra la Literaturo.

Esperanta Ligilo. Gazeto por blinduloj en brajla aboco. Fondis en 1904 T. Cart; nuna red. H. Thilander, en Stocksund, Svedujo. v. Blinduloj.

Esperantista Centra Librejo fondiĝis post la milito, laŭ iniciato de generalo Sébert. Ĝi estas anonima societo kun variebla kapitalo kaj akcioj po 25 frankoj francaj. La nova entrepreno tuj aĉetis la grandan librostokon de Hachette, kiu ĉesigis la E-fakon jam unu jaron antaŭ la mondmilito, aĉetis stokeojn ankaŭ de aliaj librejoj kaj komencis la eldonon de francaj vortaroj kaj gramatikoj elĉerpitaj. Ĝia komenca kapitalo de 45.600 fr. fr. en 1920 kreskis ĝis 85.575 en 1933 kaj la venditaj libroj en 1920 fr. fr. 21.930, atingis en 1933 fr. fr. 144.678. Tamen ambaŭ ciferoj ne estas tro altaj, se ni konsideras la duman senvalorigon de la fr. fr., (1922—26) kvankam la librejo havas ĉiujn Zamenhof-verkojn eldonitajn, kune proksimume 80 diversajn verkojn kaj instalas ankaŭ vendadon de fremdaj eldonaĵoj. De okt. 1931. ECL troviĝas en la librocetro de Parizo (rue de Sèvres).

Esperantista Centra Oficejo. (CO.). Kiam la plej agemaj E-istoj, estroj

de la movado en la diversaj landoj, renkontiĝis por la unua fojo en la Kongreso de Boulogne-sur-Mer en 1905, ili multe diskutis la demandon pri ĝenerala organizo de la movado, kiu, de la komencaj paŝoj de E, priokupis D-ron Z kaj la ĉefajn varbitojn. La Kongreso dividiĝis en du partiojn; unu partio deziranta fortan centrigitan organizon, alia partio deziranta minimumon da organizo por lasi plenan liberecon al ĉiuj privataj agadoj. Pro tio, la demando ne ricevis kontentigan solvon kaj la partianoj de organizo nur sukcesis krei du organismojn, kies neceseco montriĝis evidenta: Lingvan Komitaton, kies prez. estis Boirac, kaj Organizan Komitaton, (por organizi la sekvantajn Kongresojn) kies prez. estis Generalo Sebert.

Post la I UK Sebert deziris, ke tiuj ambaŭ komitatoj posedu societan sidejon, adreson por korespondado, arkivojn por oficeja laborado, kaj tiucele li luis du ĉambrojn en domo, kie sidis la Franca Societo de Fotografarto, kies prez. li estis, rue de Clichy, 51, Paris; kaj ĉar oficejo bezonas oficiston, li dungis tiucele unu el la plej malnovaj kvankam juna, francaj E-istoj, Gabriel Chavet. Sed bezoniĝis ankaŭ mono. D-ro Javal (v.) oferis sumon de ĉ. 16.000 frankoj. Sebert alian sumon malpli grandan, kaj ambaŭ kunligiĝis per societa akto.

La CO ne limigis sin al rolo de simpla sekretariejo de la du Komitatoj, sed iom post iom, kun la disvolvigo kaj kresko de la movado, ĝi fariĝis centra intelekta laborejo de tiu Jen resumo de ĝiaj diversaj agadoj: Organizo de la laboro de la Lingva Komitato kaj la poste fondita Akademio; alcentrigo de la korespondado, konservo de la arkivoj; publikigo de la raportoj de tiuj du gravaj institucioj. Preparado de la UK-j, (ĝis la Kongreso de Helsinko, 1922); korespondado kun la lokaj Komitatoj; preparado de la laboraj kunsidoj; publikigo de la oficialaj raportoj; helpado al la lokaj komitatoj por garanti la elspezojn kaj pagi deficitojn. Publikigo de Oficiala Gazeto, kiu enhavis ne nur la oficialajn

dokumentojn de la du Komitatoj, sed plie, en neoficiala parto, riĉan multvaloran kolekton de dokumentoj pri la vivo de nia movado, listo de novaj grupoj, de novaj libroj kaj gazetoj, dokumentoj de specialistaj societoj ktp. — Publikigo de E-ista Societaro, kaj poste de Oticiala Jarlibro, de Bibliografio de E, ktp. — Starigo kaj konservado de Biblioteko, kie oni celis kunigi ĉiujn librojn, broŝurojn kaj gazetojn pri E. — Klopodadoj apud registaroj kaj grandaj administracioj ŝtataj kaj privataj. — Helpado al multaj prop. E-istaj entreprenoj, societoj.

Vole nevole, pro la cirkonstancoj, la CO alcentrigis multajn disigitajn agadojn kaj fariĝis la centra reprezentanta organismo de la tuta movado.

Post la morto de Javal, Sebert restis sola por finance subteni la oficejon; ĉar la unuaj sumoj de la komenca kapitalo estis elspezitaj, Sebert devis pagi ĉiujare sufiĉe gravajn sumojn kaj dum la tuta ekzisto de la CO, li tiamaniere elspezis pli ol ducentmil frankojn. Vidante, ke li ne povos daŭrigi eterne, kaj dezirante certigi la estontan vivon de la Oficejo, Sebert provis starigi, en la E-istaro, sufiĉan organizon por doni regulan buĝeton al la Oficejo. Sed nek la decidoj de la Kongreso de Kraków (1912), nek eĉ la kontrakto de Helsinko (1922) sukcesis alporti monon en la kason de la CO.

Pro tio, post la milito, dum kiu la CO restis malfermata kaj zorgata de helpsekretariejo, Sebert ne povis plu daŭrigi sian valoran malavaran helpadon, kaj iom post iom la CO ĉesis ekzisti. La ĝenerala sekr. Chavet, post la milito, ne povis dediĉi kiel antaŭe sian tutan tempon al la Oficejo. Dum kelkaj jaroj, la pordoj de la Oficejo restis malfermataj, dank' al la sindonemo de kelkaj parizaj samideanoj, sed oni povas konsideri, ke, deposit la kontrakto de Helsinko (1922), la oficiala vivo de la CO estas ĉesinta. Fine, Sebert donacis la bibliotekon kaj arkivojn de la Oficejo al la Komerca Cambio de Paris. Pri la Lingva Komitato zorgis la prezidanto kaj sekretario; kaj UEA

prenis sur sin la organizon de la UK-j.

Kvankam la CO estis nejuste kritikata, ne de la izolaj E-istoj, kiuj senpartie konstatis ĝiajn valorajn servojn, sed de kelkaj organizajoj, kiuj senmotive timis ian superregadon, kiu neniam okazis, tiu organismo faris de 1905 al 1914 plej gravajn servojn al la movado, kaj estas dezirinde, ke ĝia modela organizo estu imitata estonte.

(v. Biblioteko, Cense, Chavet, Javal, Seberty.) Laŭ G. CHAVET.

Esperantista Junularo. De jan. 1920-jun. 1924 A. Robin eldonis ĝin (ĝis julio 1920 aŭtogr.) en Baugé 2-8 p. 33×25, 24×16, 29×22, 27×19. En okt. 1924 prenis sur sin la eld. A. Neupert en Leipzig 12-16 p. 23×15. De jan. 1927-dec. 1929 (fino) la titolo estis E-Junularo 16 p. (kelkfoje kun IV) 23×15.

Esperantista Literatura Asocio. (ELA). Fondita dum la 7-a UK je la nomo Int. Unuiĝo de E-istaj Verkistoj kaj ricevinta la nunan nomon en 1912. ELA celas kunigi la E-istajn verkistojn, ekzameni iliajn manuskriptojn antaŭ la presigo. Prez. de ELA estis s-ino M. Hankel, poste t-ino J. Zschepank. En la postmilitaj jaroj ELA vigle agadis, aperis multaj raportoĵoj en 'E' informantaj pri la presotaj kaj presitaj literaturajoj, ĝi reviziis manuskriptojn ktp. Nuntempe ELA donas malmultajn signojn de la funkciado.

Esperantista Voĉo. 1. E-a eldonejo en Jaslo, Polujo (Galicio), kiu apartenas al S. Grenkamp-Kornfeld. La eldono eldonis ĉefe originalojn aŭ tradukojn de Grenkamp-Kornfeld. Entute ok verkojn en la vendovaloro de 22.50 frsv. — 2. Sola monata revuo en E, elirinta en Polujo dum 1919-21 sub red. de S. Grenkamp-Kornfeld.

Esperanto. Pri la deveno de la nomo de E Z skribas jene: »La unua broŝuro pri la lingvo E aperis en... 1887, ... sub la titolo: »D-ro Esperanto. Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro.« La lingvo en la komenco havis nenan nomon, kaj »Esperanto« estis la pseŭdonimo de la aŭtoro de la lingvo...;

sed iom post iom la amikoj de la nova lingvo transportis la estintan (nun jam ne uzatan) pseŭdonimon de la aŭtoro sur la lingvon mem, kiu portas la nomon »Lingvo Esperanto« aŭ simple »Esperanto«. (1893, v. OV, p: 161.)

Esperanto. Ĉefa gazeto de la E-movado, oficiala organo (monata) de UEA. — Fondis la gazeton la franca E-isto Paul Berthelot en jun. 1905. Post dujara baraktado li transdonis ĝin en 1907 al H. Hodler, kiu estis posedinto kaj redaktoro ĝis 1920. Tiam kaj ĝis 1910 ĝi aperis en 48×34 cm-a formato, en 1909 eĉ 60 cm alta kaj 44 cm larĝa, la »lit-tuka« periodo; paĝonombro: 4-6. Ekde 1911 la formato fariĝis 32×23. Ĝis 1914 la gazeto aperis dufoje monate kun preskaŭ matematika reguleco. La enhavo estis lerta miksaĵo de tagaj kaj E-istaj okazintaĵoj. Jam en la unuaj numeroj montriĝas la talento de Hodler, turni la atenton al praktikaj aferoj. Li tendence atentis sociajn problemojn kaj ĉiam revenis je la ĉefa ideo: harmonia kunlaboro de ĉiuj popoloj pere de E. En 1908 fondiĝis UEA, konkreta solvo de tiu ĉi ideo. La evoluon trans ĉi la milito. Post kelkmonata interrompo tamen reaperis la revuo en 1915. En artikoloj ankoraŭ nun legindaj la redaktoro montris la kaŭzojn de la tutmonda katastrofo, laŭgrade evoluigante la ĉefajn ideojn pri la intergenta malordo. Hodler mortis en apr. 1920, la revuon heredis UEA kune kun sumo por kovri eblan deficiton. Nova redaktoro fariĝis E. Privat, kiu fidele sekvis la tradicion de la revuo kaj klopodis igi ĝin tribuno de plej noblaj ideoj. Periodaĵo, kiu servas por movado kun nepolitika karaktero, por movado lingva, internacia, kaj kies legataro grupiĝas en ĉiuj klasoj sociaj, havas certan malfacilecon. Aŭ ĝi fariĝos senkolora, oficiala komunikilo plej teda, aŭ ĝi estos amuziga kafotabla legaĵo kun rakontetoj infancaj. Multaj temoj estas neeblaj por ĝi, aliaj postulas atenton, dekstre kaj maldekstre, dume restas ankoraŭ la plia malhelpo, ke la legataro ne estas unuforma. Nombro de la presitaj ekzempleroj: en 1913 66.000, en 1920 35.000, en 1925 96.000, en 1930 75.000.

en 1932 72.000. Paĝonombro en 1913 382, en 1920 244, en 1925 234, en 1930 210, en 1932 200. La teknikan aranĝon kaj parte la redaktan laboron prizorgas la direktoro de UEA, H. Jakob, la recenzadon de l' libroj plenumas de 1920 G. Stroele. At la revuo ĉiam kunlaboris aro da bonaj verkistoj.

(Noto. Kompilita laŭ UEA-Jarlibro 1933, p: 53—55, 104.)

Esperanto-Bladet. Organo de la norvega E-movado, fond. en 1932; formato 30×20 cm. Red. H. Bonnevie.

Esperanto-Domo, domo kun bieno en la holanda urbo Arnhem; apartenas al la Int. Cseh-Instituto. (v. Cseh-metodo.)

Esperanto kaj Volapük. Traktajo de Z aperinta en La E-isto, 1889/90, kaj represita en la OV, p: 258—275.

Esperantologio. Tiel oni nomas, laŭ Wüster, la specialan E-an lingvistikon, okupigantan pri vortkonstruo, vortkunmeto, vortenkonduko, transskribo de int. fakvortoj kaj de propraj nomoj. E-logiaj principoj de vortkonstruo estas ekzemple la principoj de Necesoj kaj Sufiĉo (v.) kiuj postulas ekvilibradon inter koncizo kaj klaro de l' vorto. Rilate al vortradikoj la E starigas

1. la principon de internacieco,
2. la principon de analogeco kun aliaj lingvaj elementoj,
3. la principon de vortara ekonomio

4. la principon de la bonsoneco.

Kiel oni vidas, ĉi tiuj principoj ne ĉiam estas akordigeblaj inter si; ekzemple la internacieco postulas la vorton internaciana dum la analogeco kaj vortara ekonomio postulas internacia. En la lingvo ŝajnas pli grava la 2-a kaj 3-a principoj ol la 1-a.

Krome la nepran validiĝon de E-logiaj principoj baras ankaŭ la lingvouzo, kiu povas sankcii formojn ne tute ĝustajn kaj povas igi klaraj formojn per si mem neklarajn.

Kaj ricepe oni devas akcenti, ke laŭ la supraj principoj oni povas kritiki nur la vortojn novajn, sed ne la praajn aŭ enradikiĝintajn vortojn de la lingvo. Estas evidente, ke tiaj klopodoj kunportus nur skismojn, ĉar

ĝenerala konsento neniam estus ebla pro la manko de l' absoluta akordigebleco de l' principoj. Do tiaj klopodoj, kiajn faris ekz. Sentis por fari analogecon inter la vortoj naskitaj de sama latina radiko (supozi, propezi, ripozi, kompozi, opozi; produkti, tradukti, kondukti; ktp.) estas funde eraraj, ĉar ili ne konsideras la tradicion kaj la postulon de la lingva unueco, kiu estas pli grava ol ĉiuj aliaj principoj.

Literaturo: Wüster: Esperantologiaj principoj (E-Germana Vortaro); Neergard: Fremdvortoj en E. Tie oni trovas ankaŭ bibliografian liston. KALOCZSAJ.

Esperanto por Infanoj. De G. G. SLOMON. 1930, 69 p. Lernilo kun multaj ilustraĵoj, uzbla de ĉiu ajn naciato.

Esperanto-Praktiko. Tuj post la mondmilito F. Ellersiek povis efektiviĝi planon, kiun li jam havis antaŭ la milito, nome; eldoni gazeton »EP« por beletristiko kaj pliperfektigo. De jan. /febr. 1919—nov./ dec. 1921 EP aperis monate en E kaj germ. lingvoj kaj enhavis krom lingvaj demandoj kaj literaturo ankaŭ ekzercojn en germ.-lingvo kaj E; formato 23×15, 16—24 p. De jan. 1923 ĝi fariĝis int. gazeto kun formato 24×17. Pro la malfavora ekonomia situacio EP de okt. 1923 fariĝis parto en Germana E-isto. En jan. 1927 EP fariĝis denove memstara, formato ĝis dec. 1928: 24×17 kaj de jan. 1929—dec. 1931: 22×14; paĝnombro: 1927—31: 16—20.

P. TARNOW.

Espero Katolika. Organo de IKUE, la plej mainova E-gazeto aperanta ĝis hodiaŭ. Fondinto: pastro Emil Peitler, Tours (Franc.) kiu la unuan n-ron eldonis okt. 1903 kaj estis la animo de la gazeto ĝis 1908. Poste red. estis ĝis 1911 Claudius Colas, Paris. De 1911—23 red. J. Smulders Holando. (en 19H21 F. Meštan, Wien), 1924—32 G. Ramboux, Paris, de 1932 Font Giral, Hispanujo. Formato nuna 27×18, paĝonombro varia. Jam en la 1-a p-ro estis alvoko akcentita: »For la neŭtralismo!« kaj EK restis ĉiam konscia, eĉ ofte »militanta« defendanto de la katolika dogmaro kaj eldezio. EK aperis ĉiam kun la aprobo de la ekleziaj

aŭtoritatoj kaj akisis triro tritoje apostolan benon de la papo.

v. detalan historion en la jubilea n-ro de EK, 1928.

Esprimo de Sentoj en Esperanto. Verkis Privat. Resumo de kurso farita ĉe la Universitato de Genevo dum 1929 kaj 1930. 1931, 67 p. »La enkonduka parto pritraktas la gramatikan skeleton de E kompare al la »naturaj« lingvoj. La ĉefa parto: mikroskopa kaj sprita analizo de nia lingvo uzata en la vivo, precipe serĉante la esprimmanierojn de l'sent-oj.« (Totsche, LM, 1931, p. 159.)

Esselin (eslen) Albert, franco, emerita prefekteja konsilisto. Nask. 26 okt. 1860 en Ecaille (apud Caen). Fondis grupojn kaj propagandis en diversaj urboj. Verkis: Traduko el D' Estournelles de Constant: Limigo de l'armadoj, 1907. Grammaire et Syntaxe d'E, 1908. Unu el la kvar aŭtoroj de la fama Plena Vortaro de E (v.) LK de 1929.

Esteban (estevan) Manuel, hispano. Mortis. Estis prez. de HSPE. Kuntradukanto de la H. ŝlosilo, verkis broŝurojn.

Essigman Stanislaw, polo, dentkuracisto. Nask. en 1868 en Warszawa. Multjara del. de UEA. Agema E-isto en lokaj aferoj. Prez. de la Postkongreso en Warszawa, 1927. Prezidis la solenan malkovron de la Z-monumento (sur la tombo).

Estona Antologio. I. parto: 1932. 136 p. »Bonelektitaj literaturajoj de la estonaj poetoj el la unua periodo. 16 personoj partoprenis la traduklaborojn. La rezulto de la plej zorgeme kaj plej sciencie faritaj laboroj estas brila. Polurita, brilpura lingvo, klasike Z-a.« (Butin, HDE, 1933, n-ro 8.)

Estonta Eduko. De Ad. Ferrière, el la franca trad. Danneil. 1929, 72 p. »Estas detale pritraktata la nova, puraera lernejo, kie mem la infano serĉas la vojon de sia evoluo laŭ la preskaŭ nesentebla, prudenta direktado de la instruisto.« (Szilágyi, LM, 1931, p. 126.)

Estonujo. Antaŭ ol E penetris Estonujon, ekzistis tie movadeto por Volapük: aperis 2—3 lerniloj por es-

tonoj, propagandis Tartua univ. prof. von Oettingen, ĵurnalisto A. Grenzstein, J. Leppik.

La unuajn E pionirojn varbis reklamoj en estonaj gazetoj kaj prop-iloj disvastigitaj de la Peterburga E Societo »Espero« (fond. 1892). Villem Vaher, Hermann Stahlberg, Jaan Tenisson estis tiel varbitaj. La komencon de memstara estona E movado signas la apero de la unua E lernilo estona kiel aldono al la populara ĵurnalo »Postimees« (1893). Ĝia vortaro E-Estona estis en 1895 represita en Nürnberg. Duan lernolibron estonan aperigis en 1899 H. Stahlberg. Dume en Narva jam en 1896 ekzistas grupo da E-istoj. Vera movado ekestas tie, kiam J. Tenisson en 1901 fervorege varbas, agitas, instruas pri la nova lingvo. Tiam J. A. Rahamägi aperas en Tallinn sur la scenejo kun gazetartikoloj, lernolibroj. Kune kun F. Krass kaj f-ino Marta Reichenbach en 1907 li fondas la unuan estonan E societon. J. A. Rahamägi aperigas kune kun kelkaj fervoruloj en 1907 hektografitan, en 1908 presitan E gazeton Estlanda E-isto. Fondiĝas privata E klubo en Pärnu, oficialaj societoj en Narva (1911) kaj Tartu (1914). La »malvasthorizonta« rusa polico ĵaluze ekatentis la novan movadon, kiam ekde 1907 komenciĝis intensa propagando per ekspozicioj, eldono de E-aĵoj, aranĝado de kursoj, de vesperfestoj kaj ekskursoj (al Finnlando, kie okazis amika akcepto de la fratgentaj samideanoj). La pioniroj de E aranĝis eĉ prop. E paroladojn de eksterlandaj E-istoj: de Parishi el Usono (1912) kaj Pitlik el Praha (1913).

Karakteriza trajto de tiu unua estona E movado estas la persista uzado de E en la societa vivo kaj en la intersamideanaj rilatoj. Tio parte estis eĉ nepre necesa, ĉar en Tartu la societo iam havis anojn el 7 nacioj, ĉar Tartu estis universitata, internacia urbo.

La mondmilito parte haltigis la societatan vivon, la februara revolucio en 1917 akcelis pli viglan agitadon kaj propagadon, sed ĉion ĉesigis la invado de la germana armeo en 1918.

Gia foriro en la aŭtuno samjara ebligis rekomencon de kulturceladoj estonaj, jam en libera lando, sur propra teritorio (la Estona Respubliko estas proklamita 24 feb. 1918). La tri nomitaj societoj ekhavis heredantojn: en Tallinn V. Aro, J. Vahtkeri, Helmi Dresen fondas Estonan Unuiĝon »Espero« (1919), kiu transprenas la bibliotekon de la malnova societo kaj al kiu aliĝas pluraj malnovaj agemaj anoj: J. Rosenberg, A. Tippi, T. Ounapuu, M. Tartu k. a. En Tartu UEA-del. Rudolf Blaufeldt kune kun stud. H. Busch funkciigas novan societon (1921), same fondiĝas societoj en Narva (1921), en Haapsalu (1921) kie estas nominda pioniro Joh. Grünthal, del. kaj dumviva membro de UEA, varbinta por E la eldoniston P. Tamverk, eldonintan diversajn utilajn E librojn; en Valga (1922), Pärnu (1930), Võru (1929) Sindi (1930), Rakvere (1931), Viljandi (1932) kaj aliloke. Tiuj ĉi neŭtralaj societoj estas unuigintaj en E-Asocio de Estonio (fondita en 1922). Krome fondiĝis fakaj E societoj aŭ grupoj en diversaj lokoj: junularaj, laboristaj, instruistaj, fervojista, k. a.

Ekde 1921 la estona E-istaro havas daŭrajn interrilatojn kun eksterlandaj E-istoj. Somere de 1921 okazis memorinda vizito de finnaj samideanoj al Tallinn (partoprenis Vilho Setälä, Leo Jalava, A. Sandström k. a.) Poste tiaj vizitoj fariĝis pli oftaj kaj ankaŭ la estonoj kelkfoje ĉestis karavane la UK-jn.

En 1925 fondiĝis E Instituto (EIE), do la estonaj E-istoj povas de nun ekzameniĝi pri korespondist-, instru-, scienca kapablecoj, ricevante diplomojn rekonatajn ankaŭ de oficialaj instancoj. La ekzamenpostuloj respondas proksimume al tiuj de Germana Instituto en Leipzig. Sed la labor-kampo de EIE ŝajnas esti pli vasta, estante dividita en aŭtonomajn sekciojn: lingvan, lingvopedagogian kaj lingvohistorian. La nombro de la ekzamenitoj ĝis 1 aŭg. 1932 estas 318.

La prop-aj metodoj akiras pligrandan amplekson: al la malnovaj rimedoj aldoniĝis radio (ekde 1927 regule okazadas radio-paroladoj en la

sendstacio de Tallinn), diskonigo de Estonujo eksterlande per eldono de E-aj broŝuroj, subvenciate de la ŝtato; fondo de propra per E-a Turist-Societo »E -a Turista Komisiono« (1930), aranĝinta jam multajn ekskursojn al Svedlando, Laponujo kaj aliloken, kaj la unuan grandan aŭtobusekskursion al Parizo tra diversaj landoj (1932).

En 1920 ekaperis manskriba Egazeto Estonia E-ista Revuo ĉe la Tallinna societo; ĝin sekvis en 1922 Informoj de E Asocio de Estonio (hektografita). De 1923 la gazeto aperadas presite. Kreskas la estona E literaturo: la modestajn unuajn lernolibrojn de Vaher, Stahlberg, Rahamägi, ekstere kaj enhance nesufiĉajn, sekvis iom pli altnivelaĵoj eldonaj de J. Rosenberg. En 1926 aperas la unua kompleta lernolibro por memstudantoj de magistro M. Arvisto, 1926 la tre kompleta E-Estona Vortaro de »Vo-Ko« (Vortara Komisiono, laborinta ĉe »Espero« gvidate de Helmi Dresen). »Konversacia kurso de E« de Vaher (1930) atingis jam 3 eldonojn. Granda okazaĵo estis la apero de la unuaj E tradukoj de estonaj aŭtoroj: de »Mabonaj flankoj de la sporto« de d-ro J. Wilms (trad. J. Vahtkeri) kaj de »Kvin Noveloj« de Fr. Tuglas (trad. H. Seppik). Nunamonte la nombro de la estonaj E eldonaĵoj estas taksata je almenaŭ 60 (eldonkvanto proks. 100.000 e-roj). En 1933 aperis ankaŭ la »Estona Antologio«, kolekto de klasikaj verkoj de la estona literaturo en E.

La instruado de E post 1920 tre senteble fariĝis plisukcesa. Okazis post tiu tempo centoj da kursoj diversloke. Dank al la disvastiĝo de laŭnaturaj instrumetodoj (kun laŭbebla evitado de enua libro-laboro) la E kursoj ĝuas nun jam la famon de ekstreme agrablaj kaj utilaj »tempopasigoj« Pastro Cseh mem instruis en Estonujo kelkajn kursojn (1928, 1929 kaj 1931). Li varbis inter la estonoj fervorajn disĉiplojn, el kiuj ĉefnomo Seppik, Elinjo Pähni kaj Neeme Ruus estas instruistaj eksterlande E-n kun granda sukcesoj. Krom A. Cseh en Estonujo estas

gvidintaj E kursojn Julio Baghy el Budapeŝt, Gösta Ahlstrand el Alvarkeö, Karl Tunón el Uppsala k. a.

Jam antaŭ dek jaroj eksperimentinstruis V. Vaher E-n en urba elementa lernejo de Tallinn. En 1922 ekinstruis kun daŭra sukceso Elinjo Lübek la lingvon en knabina elementa lernejo samurbe kaj gvidas tie la E lernadon ĝis nun. En 1923 P. Ernits ekinstruis en Valga-j elem. lernejo kaj gimnazio, kun bona sukceso. Dank' al 2 someraj kursoj de pastro Cseh, aranĝitaj por instruistoj en Tartu la E instruado penetris en tre multajn kamparajn lernejojn, dispartite de la kursanoj. Sekve de tio la Int. Cseh Instituto havas en Estonujo specialan reprezentanton, instr. Joh. Jaanisto en Tartu, kiu observas la evoluon de la Cseh-metodo en la lando.

La registaro kaj ĝiaj organoj jam kelkfoje estas oficiale rekonintaj la E movadon. La Helsinki-an mondkongreson patronadis ankaŭ la estona ambasadoro d-ro Fr. Akel, la Nürnbergan kongreson ĉestis reprezentanto de la estona klerministerio, en 1924 aperis dekreto de la klerministerio pri laŭdezira instrueblo de E en lernejoj, du jarojn la estona E gazeto ricevis subvencion de la ŝtato, E Turista Komisiono havas oficialan reprezentantlokon en la ŝtata turismokomisiono ktp. En 1925 E estis instruita je ŝtata kosto en la Tallinna instruista seminario, ŝtate subvenciitaj estis ankaŭ la supre menciitaj porinstruistaj Cseh-kursoj (en 1928 kaj 1931). Dum la ŝtate subvencita kongreso de instruistoj de fremdaj lingvoj en Tallinn (1927) ankaŭ la estonaj E instruistoj oficiale kunsidis en propra sekto, voĉdonis dum la ĝeneralaj kunvenoj.

E-Asocio de Estonio. Ĉ. 500 anoj. Monata gazeto: »Informoj de E-Asocio de Estonio.« Prez. Vaher, aliaj estraranoj: J. Törn, K. Brauer, Helmi Dresen, E. Lübek, E. Eik, E. Mälson, A. Siitam, a-ro M. Kolomoicev. Societoj aŭgintaj al EAE: »Espero« en Tallinn, prez. J. Törn; en Tartu, prez. J. Jaanisto; en Valga prez. E. Ernits; en Narva, prez. K.

Kultman; Akademia E-Klubo en Tartu, prez. prof. d-ro H. Richter; en Sindi, prez. Aŭg. Ots; en Võru, prez. A. Marju; Rakvere, estraranoj Kihlefeldt, Koov, Liiv, Markson kaj Priks; en Viljandi, estraranoj A. Pung ktp. — Laborista E-Asocio. — E-a Turista Komisiono. — E-Instituto de Estonio. Direktoro Vaher, fakestroj Sakaria, Seppik, Törn, Helmi Dresen, Lübek, Eik.

Literaturo. »Informoj de EAE« 1922—32, speciale n-roj 41—44, 48—52.

Rimarko. La artikolo pretiĝis per kunlaboro kaj kontrolo de E-Instituto de Estonio. H. SAKARIA.

Estu homo. De C. Wagner, trad. Sam. Meyer. 1912, 97 p. »Ĝi studas la fundamentajn leĝojn de la homa naturo kaj vivo. Klara, facila, eleganta stilo de la traduko.« (L. I. 1912, p: 453.)

Eterna Bukedo. Trad. Kalocsay. 1931, 352 p. Poemoj el 22 lingvoj, 115 aŭtoroj. »Preskaŭ kronologie, iom laŭlingve kaj laŭskole ordigitaj, ili kondukas nin de egipta faraono al grekaj, latinaj, orientaj klasikuloj, ĝis la ĉefaj aŭtoroj de P' lastaj jarcentoj, ĝis antaŭmilitaj verkistoj. Grava, rimarkinda, altnive'la verko, kiu estos fonto por multaj legantoj de utilaj komparoj, artaj ĝuoj, noblaj pensoj, benaj emocioj.« (G. S., E' 1932, p: 85.)

Etiko, I. De Kropotkin, trad. el la rusa. 1926, 236 p. »Filozofia studado pri la deveno de P' moralaj konceptoj. La valoro de la traduko estas nediskutebla, kvankam la frazoj estas ofte longaj.« (G. S., E' 1926, p: 209.)

Etimologia Leksikono de Esperanto. Kompilis L. Bastien. 1907, 249 p. La verko enhavas 2.445 radikojn de E kaj la parencajn formojn en la lingvoj latina, franca, itala, hispana, portugala, germana, angla, rusa. La ideo de la verko: montri, kiun lokon okupas E inter la lingvoj de P' civilizita mondo.

Etiopujo. (Afriko.) Laŭ UEA—1928 la unua E-isto estis Karlo Ludvik en Addis Abeba en 1925. Laŭ la Diettele-statistiko E-istoj estis nur en A. A.

Eŭgenino Grandet. Romano de Balsac, el la franca trad. Gasse, 1909, 226 p. Scenoj de la vivo de provinco. »Tiuj, kiuj ŝatas la puran, klasikan lingvon, ĝin legus sen ia plezuro. »Sciencoza« kaj nenatura lingvaĵo.« (Th. Co., LI, 1909, p: 92.)

Eŭgeno Onegin. Romano en versoj de Puŝkin, el la rusa trad. kaj komentis Nekrasov. 1931, 236 p. »Estas verko apartenanta al la tutmonda literaturo. Estas amrakonto, en kiu finfine la amata heroino ne sekvas la voĉon de la naturo, sed sin fordonas al maljuna princo. Nekrasov faris tre diligentan laboron, plaĉe plaŭdas la rimoj.« (Aso, La Socia-listo, 1931, p: 116.)

Eŭropa lingvo. Gvidantoj de la UŜE-movado (v.) proponas (kaj uzas) tiun nomon anstataŭ E pro la sekvaj motivoj. Per tiu ĉi nomigo estus pli akcentata la natura deveno de E, ĉar ĉe la amasoj la nomo E ĉiam signifas artefaritan lingvoprojekton. La fakto, ke E estas la sintezo de P indo-eŭropaj lingvoj, estis ankaŭ ĝis hodiaŭ bone konata, sed oni ne eluzis, ne akcentis sufiĉe ĝian sciencan enordigon kaj envicigon inter la indo-eŭropajn lingvojn. Ne en la strukturo de E estas serĉenda la kaŭzo de tio, ke ĝi ne akiris ankoraŭ la amasojn, sed en la ĝisnuna malĝusta, erara prop. metodo, ktp. (L. ŬSE-EŬO, majo 1933.) »La japana E-istaro konstatas, ke se la opinio pri E kiel »la eŭropa lingvo« estus aprenata de la plimulto de niaj eŭropaj samideanoj, la disvastiĝo de nia lingvo en la Oriento estus grave endanĝerigata.« (El la rezolucio de 21-a Japana E Kongreso, 3 nov. 1933.)

Eŭropo. v. la rubrikojn pri ĉiulando.

Eŭropo ĉe la Abismo. Verkis: Nititi, iama ministrara prez. de Italujo, al E trad. R. Kreuz. 1924, 179 p. »Homo, kiu mem gvidis la sorton de unu el la ŝtatoj de venkintoj, pro sento de respondeco havis la kuraĝon, senindulge malkaŝi antaŭ la konscienco de la mondo la frenezecon kaj konfuzecon de la kontrakto de Versailles.« (El la Enkonduko.)

Evoluo de Esperanto. La koncepto pri evoluo propre apartenas al la bio-

logiaj sciencoj, t. e. al la sciencoj, kiuj pristudas la vivantajn estaĵojn. En ceteraj sciencoj, kaj aparte en lingvistiko, la vorto evoluo, same kiel la vortoj organismo aŭ vivanta, povas esti uzata nur metafore kaj ricevas sian ĝustan kaj precizan senco nur kompare al sia malco revolucio. Dum revolucio estas ia abrupta, rapida kaj detrua transformiĝo en ia organizaĵo, evoluo estas vico da malrapidaj iompostiomaj ŝanĝiĝoj, konformaj al la naturo de la objekto kaj alla vivbezonoj. La karakterizo de ĉia evoluo estas modifiĝo de tio, kio ekzistas, sed modifiĝo postupa kaj supra, ne tuŝanta la esencajn ecojn. Ĉiuj vivantaj naciaj lingvoj evoluas, ĉar tio, kion oni nomas vivanta lingvo, estas lingvo efektive praktike uzata kaj kies normala evoluo estas certigata per interkonsento de opa sufiĉe multnombra kolektivo da uzantoj. Samo okazas pri E: »Ĝi devas, asertas Z, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiuj estis elaborataj ĉiuj vivaj lingvoj.« Kaj la faktoj plene pravigis la Z-an koncepton. La evoluo de E efektiviĝas per jenaj procedoj: 1) Analoga kaj logika utiligo de ĉiuj eblaĵoj, kiuj estas entenataj en la strukturo de la lingvo kaj en ĝia fleksebleco, sed kiujn oni antaŭe ne atentis. Precipe rimarkinda estas la vasta uzado de diversaj afiksosoj kiel memstaraj vortonaskaj radikoj (eta, etulo, etburgo, et-skale, ega, egeco, eke, eki, fora, foreco, fia, fiulo, ktp.). El tiu ĉi utiligo de la kaŝitaj eblaĵoj sekvas ankaŭ la forlaso de kelkaj malpermesoj, kiuj estis nuraj naciismoj senkonscie akceptitaj dum la unuaj periodoj sed kontraŭaj al la logiko. Oni povas ankaŭ uzati kaj ankoraŭ ne kontrolitaj de la vivo, eble pli poste estos akceptataj. 2) Ĝenerala emo al plej mallongaj formoj, kiel ĉi anst. ĉi tiu, aŭto anst. aŭtomobilo, fora anst. malproksima, eta anst. malgranda; precipe rimarkinda estas la forlaso de la internaciaj sufiksosoj aci, ici, uci, (pli konforma al la

instruoj de la Fundamento estus la nura forjeto de i: Ekz. a pelaco laŭ la modeloj donaco, kapitulo, kuraco.) 3) Modifo de la signifo de kelkaj radikoj ĉu per plilarĝigo aŭ metaforigo ĉu per malplivasigo kaj pliprecizigo. Ekz.: Agiti, agordo, angoro, apogi aroganta, embaraso, ĝentila, komponi, konfuzi, konsenti, neta, prudenta, planto, svati, torento, trakti ktp. Oni devas ne konfuzi tiajn akcepteblajn plilarĝigojn aŭ pliprecizigojn de signifo kun iaj signiforeverzaj tute kontraŭaj al la Fundamentaj difinoj, kiel uzo de domaĝi kun la senco difekti. 4) Sed la evoluo de E konsistas precipe en la plimultiĝo de la radikaro. Dum longa periodo tiu ĉi plimultiĝo estis malrapida kaj poïoma, sed poste la verkantoj pli kaj pli kutimiĝis enkonduki konstante kaj amase tiel multajn novajn radikojn, ke estus nesingarde konsideri tian torentan inundon kaj senĉesan ŝveliĝon kiel normalan sendanĝeran evoluon de la lingvo. Certo estas, ke E, same kiel ĉiu ajn kulturlingvo, devas kapabli kontentigi la bezonojn de la artisma literaturo. Tamen ni ne forgesu, ke malplejmulto lernas E-n pro artismaj celoj kaj en la beletro kaj la poezio ne kuŝas la ĉefa utileco de lingvo internacia, kies precipaj esencaj kvalitoj nepre estas kaj restos simpleco kaj facileco. La beletristoj ne troigu siajn postulojn. Ne nur enkonduko de senutilaj duobloj de jam ekzistantaj vortoj estas evitinda kaj anstataŭo de malhelpo, ŝati, malŝpari, esti permesata, malĝoja, malmola, kompatanda per la nelogismoj obstaklo, aprezi, disipi, lici, trista, dura, povra ne estas pliriĉigo sed plibalastigo kaj plikomplikigo de la vortaro, sed ankaŭ trosubtila nuancigo de la lingvo kaj pretendo rekte traduki per aparta vorto ĉiun ajn apartan vorton de ĉiu nacia lingvo ne estas, eĉ laŭ artisma vidpunkto, aprobinda. »Se en E, skribis prave Cart, ni volas esprimi ĉiujn nuancojn de la homa sento kaj de la homa penso, kiujn cetere tradukas plensukcese neniu el niaj naciaj lingvoj, certe nia lingvo fariĝos

pli riĉa ol iu ajn alia, sed samtempe tiel malfacila, ke ĝi ne atingos plu sian klare difinitan ĉefan celon: esti komuna internacia komprenilo por la popoloj. Ĝian socian rolon superemos la beletristika rolo, kiun oni ne rajtas malŝati, sed kiu tamen devas resti flanka; ornamajo tre dezirinda, sen ia dubo utila, sed ne esenca. «Ni do daŭrigu permesi, ke ĉiu povu libere proponi novajn terminojn aŭ formojn, kiujn li bezonas aŭ kredas bezoni, sed ni ne akceptu ĉion ajn tro facile kaj senkritike. Ni akceptu nur la novaĵojn necesajn kaj konformajn al la bezonoj de la uzantoj; plie, ni konsideru tiujn novaĵojn kiel definitivajn nur post kiam ili estos kontrolitaj kaj kribritaj de la vivo kaj ankaŭ oficiale konfirmitaj de la Lingvaj Institucioj, supera aŭtoritato registranta la efektivan lingvan evoluon. La evoluo, t. e. la sorto de E kuŝas, kiel diras la Deklaracio de la Akademio, en la manoj de la E-istoj. Tiu ĉi evoluo povas esti normala kaj sendanĝera nur se ĉiuj E-istoj komprenas kaj plenumas sian devon, submetante sin al memvola disciplino, se ĉiuj recenzistoj montras laŭcelan severecon, kaj se ĉiuj gazetistoj kaj verkistoj atentas ne nur siajn proprajn lingvajn bezonojn kaj facilecojn, sed ankaŭ la ĝeneralajn superajn interesojn de la movado.

E. GROSJEAN-MAUPIN.

Evrot (evro) Joseph, (ps. Verto), franco, licea prof. Nask. 13 apr. 1859 en Chambéry, mortis 3 marto 1920 en Bonneville. Gvidis unu el la unuaj kursoj en liceo pri E. (Grenoble 1902). Prez. de grupoj (Grenoble, Chambéry). Faris kursojn, paroladojn, artikolojn en francaj kaj E-aj gazetoj, prop. broŝurojn. Tradukis: Brueys kaj Palapat: Advokato Patelin, 1904. Postlasis kelkajn nepresitajn manuskriptojn (Georges Dandin, de Molière). L. K. 1909.

Evstifejev Nikolai, ruso. Malnova E-isto, (jam ĉ. 1890), kiu laboris amplekse kaj diversmaniere por E. Kunlaboris je L' E-iste, Juna E-isto, Český E-ista, Lit. Almanako de L. I., S. R. ktp.

Export E-ist aperis en Chicago de jan.—julio 1909 kaj de jan. 1922 sept.

—okt. 1924. Red. E. M. Pope. 4—8 p. 31×23. Pritraktis komercajn, industriajn, eksport-, ekonomiajn, patent-kaj similiajn aferojn. P. TARNOW.

Eyquem (ekem) Daniel, franco, supera juĝisto. Nask. 13 marto 1852 en Bordeaux, mortis 24 jan. 1926 en Paris. Prokuroro en Limoges; li aliĝis al E en 1906 kaj tuj entuziasmiĝis. Vicprez. de la grupo (1907). Dum sia cetera vivo li laboris por la ideo. En

1923 elektita prez. de la SFPE. La tasko estis malfacila. En tiu momento la Societo aliformiĝas; ĝi estis Asocio de individuoj; ĝi fariĝas unuigo de grupoj kaj federacioj. Malgraŭ sia aĝo, li akceptis tiun rolon. Plie li pli speciale klopodis letere kaj persone ĉe la registaro kaj la grandaj publikaj institucioj. Al sia arda idealismo li kunigis flaman esperon kaj laborpovon admirindajn.

F

Fabeloj de Andersen. Trad. Z. Unua parto 1923, 152 p., dua parto 1926, 154 p., tria parto 1932, 153 p. »A. apartenas al la plej klarvidaj, plej klarmentaj verkistoj de l' homaro. La traduko: krom la ĝuo de tiu diafana stilo, kiu tiel senpere interpretas al ni la belajojn de la originalo, ni povas en ĝi ankaŭ ĝoji pri formoj, kiuj estas kvazaŭ decidoj pri diskutataj aferoj.« (Totsche, L. M., 1932, p: 159.)

Fabiola. Romano pri la katakomboj, de kardinalo Wiseman, el la angla trad. Ramo. 1911; dua eld. revizita de Em. Robert, 437 p. kaj 24 bildoj. Interesa rakonto, priskribo de la moroj de la romanoj kaj la unuaj kristanoj. Bonega traduko. Flua kaj plaĉa stilo.

Fabrikmarkoj, v. Varnomoj.

Facchi (fakki) Gaetano, italo; administranto, sekr. de Faŝista Instituto de Kulturo de Brescia. Nask. 2. dec. 1888 en Brescia. E-isto de 1920. En 1922 fondis grupon en Brescia, gvidis multajn kursojn ĉe diversaj asocioj, ankaŭ por instruistoj. En 1925 instigis la Komercan Ĉambiron de sia urbo dissendi E lingvan cirkuleron pri la itala komerco kaj industrio al ĉiuj delegitoj de UEA; la cirkuleron oni tradukis en naciajn lingvojn kaj aperigis en multaj ĵurnaloj kaj dokumentaroj de komercaĵĉambroj. Depost 1926 delegito de itala E movado por eksterlando: (Informservo) De 1931 estrarano de IEF; prof. de E ktp. Lingvistaj, literaturaj, historiaj artikoloj en E gazetoj. Trad. la komedion »Naskiĝo« de Nicodemio, prezentita en Udine dum la nacia E kongreso, 1929. Verkis prelegon S-ta Francisko kaj Budho,

1930. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Facila Legolibro. 1923, 64 p. Simple verkitaĵ resumoj pri naŭ originalaj E romanoj; artikolo de W. B. Johnson pri la literaturo de E.

Fadenhecht Josif, bulgaro, d-ro, univ. prof. de juro, eksministro de la juĝaferoj. Prezidis publikan kunvenon dum verda prop. E-semajno en Sofia en 1924.

Fairbairn (ferbern) Arthur Rees, anglo, arkitekto. Nask. 6 majo 1884 en Sunderland. Laika predikanto metodista. Arheologo. De 1920 prop. sekr. por E movado en nordorienta Anglujo. Fotografas kaj paroladas kun lumbildoj pri UK-j.

Fairman (ferinn) Charles Arthur, anglo, diskonta makleristo. Nask. 21 nov. 1866 en London. Iama kasisto de BEA. Membro de UEA de la komenco.

Farges (farj) Alice-Léontine, francino. Nask. 22 jan. 1869 en Couloutre (apud Nevers) Fondis en Lyon (1910) la »E-istan Hejmon«, malfermitan al ĉiuj E-istoj. Direktas E-Oficejon de 1908. Eldonis E-ajn ĝiurmarkojn, juvelojn E-ajn, ktp. Propagandis ĉe komercistoj. Enirigis uzadon de E kaj organizis prop. budon ĉe Foiro de Lyon.

Farkas (farkaŝ) Ferenc, hungaro, elektromuntisto. Nask. 1903 en Nagyvárad (nun Oradea Mare en Rumanujo). E-isto de 1923. Estis tre fervora laboranto, plurfoje centra sekr., vicprez. de HESL en la postmilitaj jaroj. Multaj kursoj, paroladoj.

Fast Paul, germano, instruisto en komerca lernejo. Nask. 21 sept. 1853, mortis 28 okt. 1928. Kunfondinto de E-

grupo Königsberg (1907). Verkis E gramatikon.

Fatala Suldo. Teozofia romano de Dalsace, el la franca trad. E. F. Cense. 1910, 318 p.

Faulhaber Frits, nederlandano, dompentristo. Nask. 8 aŭg. 1893 en Amsterdam. E-isto de 1912. Propagandis en la armeo 1917—18. Estrarano de FLEN 1920—23 kaj 1927—34 Red. ties organon *Arbeider E-ist* en 1929, kunred. de ĝia lingva aldono 1931—34. Prez. de la Laborista E Ekzamena Komitato. Radio-paroladetoj, skriba kurso por kursgvidantoj, aŭtoro de «Konsilanta Gramatiko».

Faŭsto I. Drama poemo de Goethe, el la germana trad. Barthelmess. 1923, 153 p. »F., imaga heroo, temo de multaj literaturaj trovaj definitivan formon en la ĉefverko de G. La traduko — rima kun malpli regu'aj ritmoj — estis tiel malfacila, ke rezulto pli perfekta eble ne estas atingebla. Oftaj versoj kun nenatura vortordo.» (G. S., »E», 1923, p: 182.)

Fauvart-Bastoul (fovar-bastul) Léon, franco, skadronestro en kavalerio. Nask. 27 julio 1845 en Angers, mortis 1922. E-iĝis en 1900. Ano de la fama Dijona grupo, helpis al Boirac por lia Plena Vortaro, 1909. Publikigis gravan verkon: *ŝlosilvortoj*, 1909, franclingvan studon pri 200 oftaj vortoj. Kun sia edzino kaj sia filo verkis: *Triope*. Verkis ankaŭ: *Pri la gramatika specifikado de la fundamentaj radikoj*, 1914. LK en 1911.

Fauvart-Bastoul Marcelle, edzino de la antaŭa. Nask. 14 nov. 1859 en Autry-le-Châtel (apud Orléans). Prez. de la Dijona grupo, gvidis multajn kursojn speciale por blinduloj. Helpis al Boirac por lia Plena Vortaro. Verkis: *E sen profesoro*, 1912 — *Luksa dometo*, 1918 — *Kunverkis Triope*.

Fauvart-Bastoul Louis, franco, filo de ambaŭ antaŭaj, d-ro de legoscienco. Nask. 19 sept. 1877 en Blois, 5 sept. 1914 mortpafita ĉe la Marna batalo. Li skribis en juraj revuoj kaj ankaŭ okupis sin pri muziko. Verkis: *D'une langue auxiliaire au point de vue du droit des gens*, 1906. Kunverkis *Triope*.

Favrel Henri, franco, inĝeniero E. C. P. Nask. 16 jul. 1877 en Paris. Gen. sekr. de la Radio-Klubo E-ista de Francujo. (530 anoj ĝis 1932), red. de *Radio-E*, trimonata organo de la Klubo. Prez. de la Radio-Komisiono dum la UK en 1932. Estis adm. de E Centra Librejo, ktp. Multaj artikoloj kaj raportoj; paroladoj, ankaŭ per radio. Gvidis korespondajn kursojn.

Fazel John H., usonano, laŭvice multaj profesioj, dum longa tempo pastro, presbiteria evangelisto kaj farmisto. E-isto de 1908. Kiel armea pastro en 1917 instruis E-n al oficioj kaj al simplaj soldatoj. Direktoro de la ES YPD (kun ĉ. 1000 anoj) kiu apartenas al EANA. Artikoloj ĉefe en skoltaj gazetoj.

Fels Isidoro, d-ro kaj lia edzino Regina, hebreoj el Lwów. Li — kuracisto, nask. en 1870, ŝi — en 1877. en Lwów laŭvice prezidatis multajn jarojn la EG. La infanoj parolis E-n antaŭ ol sian gepatran lingvon.

Feminismo. Ĝis la komenco virinaj ludis gravan rolon en la historio de E. Klara Zilbernik, la edzino de Z, estis kvazaŭ baptopatrino al ties verko, helpante ĝian publikigon kaj poste fidele kaj nelaciĝeme zorgante pri ĝia prospero. Krom kaj post ŝi multaj kapablaj virinoj laboris fervore por la disvastigo de E kaj ĝia interna ideo. Dume, la rolo de la virino en la mondo entute fariĝis pli kaj pli grava. Estiĝis la t. n. feminista movado, postulanta por virinoj la samajn rajtojn sociajn, ekonomiajn kaj politikajn, kiujn jam havis la virinoj. Formiĝis gravaj int. ligoj de virinoj, kiuj celis protekton kontraŭ ĉia perforta subigo de homoj aŭ popoloj kaj antaŭ ĉio malebligon de militoj. La tincelo de tiuj ligoj estas esence identa al E-ismo, kiu tamen, krom la neceso interpacigi la popolojn, ankaŭ malkovris taŭgan helpilon, por atingi tiun celon. Tion ekkonante, kelkaj klarvidaj E-istoj, por forigi la lingvajn malfacilaĵojn, decidis arigi ĉirkaŭ si kiel eble plej multe da virinoj. Kun ilia helpo ili volis pravi antaŭ la publiko, ke int. paco estas ebla nur sur bazo de int. interkompreniĝo, t. e. sur fundamen-

estas de neŭtrala mondhelplingvo, kia estis E. Tiel estiĝis Unuiĝo de E-istaj Virinoj. (UDEV.) Junaĝa kaj laŭ amplekso ankoraŭ malgranda tiu Unuiĝo jam faris respektindan sumon da laboro. Okaze de la 22-a UK, la unua post ĝia estiĝo aŭstria animo, dum demonstracio de la Londona Klubo en Hyde Park turnis sin al la virinoj inter granda amaso da ĉirkaŭstarantoj kun peto, ke ili lernu kaj poste disvastigu E-n por defendi pere de ĝi siajn virinajn kaj precipe siajn patrinajn rajtojn, kaj helpu al la fratinoj en tiuj landoj, kies leĝoj ankoraŭ rifuzas samrajtecon al la virinoj. Dum la 23-a UK en Kraków UDEV sendis gratulleteron al Ligo de Patrimoj kaj Edukistinoj pro ties propagando per flugfolioj E-lingvaj, kaj monon al Int. Ligo de Virinoj por Paco kaj Libereco. Plej gravaj estas la laboroj de la franca grupo, sekcio de UDEV. Forta estis la financa kaj morala helpo de Marcelle Tiard (mortinta en 1931). Ŝia ĉefa kunlaborantino M. Borel ofereze daŭrigas la komunan agadon, uzante sian influon en virinaj rondoj por sukcesigi E-n. (Ekz. mendis E-lingvajn glumarkojn por 1500 fr. eldonitajn de la Ligo de Virinoj antaŭ la Konferenco de Senarmigo.) La Ligo mem subtenis M. Borel en siaj klopodoj oficialigi E-n ĉe la int. kongreso de la Virinoj dum 1932, 20 diverslingvaj delegitoj jam subskribis la proponon kaj nur pro lertaj manovroj ktp. E ankoraŭ ne sukcesis, sed la propono estos ripetata je la unua taŭga okazo. UDEV mem morale kaj finance subtenas la militrezistantojn. (Ligo Einstein.)

v. UDEV. AMALIA BERGER.

Ferdinand Hirt und Sohn Leipzig estas unu el la plej gravaj germanaj porlernejoj eldonejoj, fondiĝis en 1832. Ekde 1919 eldonas ankaŭ E-lernolibrojn kaj en 1921 laŭ instigo kaj sub direkcio de Bernhard Kötze fondis E-fakon, kiu dum la lasta jardeko farigis unu el la plej gravaj eldonejoj. Eldonis inter aliaj la historioverkojn de Privat, Originalan verkaron de Zamenhof, Enciklopedian Vortaron de Wüster, kaj aliajn librojn, entute ĉirkaŭ 50 diversajn volumojn kies vendoprezon dum la aperdato atingis 250.— svfr.

Ferez (ferez) Hubert, franco, instruisto. Nask. 15 marto 1896 en Vovenne (apud Laon). Unu el la plej varmaj propagandistoj en Francujo. Starigis kaj prezidas de 10 jaroj la Orientfrancan Fed. Loĝante en Strasbourg, li faris sian tutan eblon por komprenigi al la germanlingvuloj la animon kaj kulturon de Francujo, kaj tiamaniere labori por la paco, per interpenetrado de tiuj ambaŭ civilizacioj. Kreis la plej gravan E-an prop. gazeton, en granda formato: La Tribune E-iste, redaktita en franca lingvo (20.000 e-roj). Laboris por ke en ĉiu nacio starigu simila organo nacilingva grandformata. Kreis la Asocion »Groupement E-iste de l'Enseignement« kaj »Les Légions E-istes«, kaj fondis la organizon de tiuj Asocioj sur nova fundamento: neniam okazas balotoj; estas nur direktantoj kiuj administras kaj anoj kiuj subtenas ilian agadon; neniuj statutoj; neniuj diskutoj.

Fernandes (fernandiŝ) Julia, brazilano. Mortis en 1927. E-isto de 1907. Fond. de Virina EK en 1912, kies animo ŝi estis ĝismorte.

Fervojo. Armand Berllande, franca fervojisto en Villeneuve St-Georges, publikis alvokon en E', 20 marto 1909, en kiu li instigis kunligon de la E-istaj fervojistoj. Kaj dum la UK en Barcelona 7 kaj 8 sept. okazis du fakkunvenoj de fervojistoj, kiujn ĉeestis 11 personoj el 6 nacioj. Fondiĝis int. Asocio de E-istaj Fervojistoj; Kaj oni akceptis la jenan programon: propagandi E-n inter la fervojistoj; starigi specialan vortareton; instigi int. interŝanĝon de profesiaj ideoj; eldoni adresaron; faciligi interŝanĝon de infanoj de fervojistoj dum la libertempa jarperiodo; faciligi la alveturon de E-istaj fervojistoj al la E-kongresoj. Por 1910 oni elektis prez. Berllande, vicprez. Wellons, Usono, kaj Schwartz, Aŭstrujo, sekr.-kas. Bontemps, Franc., **helpsekr.** Sandecki, Rusujo, kaj ankaŭ delegitojn por 9 landoj.

En dec. 1910 eliris la faka organo Fervojista E-isto, kiu aperadis ĝis militkomenco. Meze de 1911 la asocio jam havis pli ol 200 anojn el 15 nacioj. Dum la UK en Antwerpen 1911 oni aranĝis 3 fervojistajn kunvenojn; ĉe-

estis 15 kolegoj el 7 nacioj. Oni precipe pritraktis la fakan vortaron de Bal. Nova prez. farigis Schwartz, vicprez. Engst, Germ., sekr. Petzold, Germ., ĝen. sekr. Bontemps. Dum la UK en Krakow, 1912 la malmultaj fervojistoj kunvenis trifoje. Oni elektis prez. Tarnow, Germ., vicprez. Szymanski, Germ., sekr. Petzold, kas. Engst, redaktoroj Berlande kaj Chilot, Franc. La nombro de la membroj estis en 1912 214, en 1913 jam 227. La kunsidoj fervojistaj dum la UK en Bern, 1913, estis vizitataj nur de 8, resp. 6 anoj. La ĉiam ĉefa demando estis ankaŭ ĉi tie la havigo de monrimedoj. La agado de Berlande kaj de aliaj fervoraj E-istoj kaŭzis, ke en diversaj urboj fondiĝis fervojistaj grupoj, ekz. en Nymburk (Bohemujo), Lyon, Bostel (Holando), ktp. Eĉ landaj ligoj fondiĝis. La unua estis la Unuiĝo de Germanaj Fervoj-E-istoj, fondiĝita 2 okt. 1910.

Post la mi'io IAEF estis restarigita en 1921 en Praha, dank' al la klopodoj de S. Stojnic kaj I. Puhalo kaj dum multaj jaroj ĝi havis sian sidejon en Zagreb, Jugoslavujo. En kelkaj landoj estas fonditaj naciaj (memstaraj) E-societoj de fervojistoj, la itala fondiĝis en 1922, la svisa en 1925, la »Nagoja« en Japanujo en 1928, la hispana en 1928 de E. del Barrio kaj en Finnlando. En 1925 reprezentantoj de fervojasocio (9.000 membroj) en Kattowicze, Polujo, akceptis rezolucion, rekomendante al ĉiuj membroj lerni E-n. Samjare en Aŭstrujo A. E-Delegitaro starigis E-kursojn por fervojistoj: oni permesis en tiu lando portadon de oficiala E-insigno (verda kvinpinta, glata stelo sur blanka fono) eĉ dum deĵoro. En 1927 la ministro de trafiko en Jugoslavujo per akto de 21 marto aprobis, ke en ĉiuj vagonoj de la jugoslava fervojo, destinitaj por int. trafiko, sur oficialaj afiŝoj kaj avizoj estu aplikata E: sed ĝis nun tiu ĉi reformo ne realiĝis. En int. vagonoj de la Hungaraj Ŝtatafervojoj estas bildoj de Budapeŝt kun kvinlingva klariga teksto, la kvina lingvo estas E.

La agado de E-istaj fervojistoj instigis diversajn fervojkompaniojn kaj liniojn eldoni gvidlibrojn, prospektojn, kaj aliajn presadojn ankaŭ en E. Spe-

ciale rimarkindaj estas la luksaj eldonadoj de la aŭstria minsi erio por fervojoj en 1911 kaj en 1912, post la milito belaj eldonadoj de la ĉeĥoslovakaj kaj japanaj fervojoj. Diversaj fakaj gazetoj havis E-fakon kun pli-malpli konstanta karaktero, ekz. la sveda fervojista gazeto »Signalen«.

IAEF en la lastaj jaroj montris neviglan agadon, eĉ la oficiala organo La Fervojisto ĉesis aperi.

Kompilita laŭ la artikoloj de

TARNOW kaj SIRJAEV.

Fethke fratoj: Stefan, Jan kaj Edmund, poloj, loĝas en Bydgoszcz kaj aktive partoprenas la movadon. Verkadas ofte kune. Eldonis en P lingvo »500 vortojn de l' lingvo E«. Organizis la vojaĝojn kaj prelegojn de la negra E-isto Kola Ajayi. La meza, Jan, estas konata verkisto, uzanta la ps. Jean Forge. (v.)

FeZ, ps. de Felix Zamenhof. (v.)

Fi-Blan-Go: ps. de F. Blangarin. (v.)

Fiedler (fidler) Ilonka, hungarino, oficistino de keramikfabriko. Nask. en Pécs. Paroladoj kaj kursoj. Artikoloj precipe en Katolika Mondo, Espero Katolika kaj Kat. Vivo. Plej persista prop-isto en Pécs. (V. H. Heroldo, 1930. N-o 6.)

Filatelio, aŭ laŭsistema kolektado de la poŝtmarkoj. La poŝtmarko mem naskiĝis en 1837. En la pratempo de poŝta trafiko oni surskribis sur la kovertojn, ke la sendkosto estas pagita. La Pariza poŝtestro De Velayer presigis en 1653 vinjetajn kun la surskribo »Billets de Port Payé«. Oni uzis tiujn de 1653 ĝis 1676. La sveda parlamentano Treffenberg proponis 3 marto 1823, ke la sendkostojn oni pagu per »afrankstamppaperoj«. La planon efektiviĝis Rowland Hill en 1837 en Anglujo. Li estis la apostolo de penca afranksystemo, laŭ kiu ĉiu letero ne pli peza ol duonunco estu transportita de kiu ajn loko de Anglujo por unu penco. Kiam lia propono farigis leĝo en 1840, li eldonis poŝtmarkon. La unua efektiva poŝtmarko estis la fabrikaĵo de angla libroeldonisto Chalmers, kiu post longaj provoj kaj preparoloj enkondukis en la trafikon 6 majo 1840 la nigran unu pencon poŝtmarkon, kiu farigis

la patro de la modernaj poŝtvaloraĵoj. La ekzemplon de Anglujo sekvis en 1842 la poŝto de kelkaj usonaj urboj, en 1843 Zŭrich, en 1844 Brazilo, en 1845 Finnlando, Italujo kaj Basel. La perfektigon de la poŝta servo celis la fondo de Universala Poŝta Unio (en Bern), al kiu apartenas preskaŭ ĉiuj ŝtatoj. Laŭ la kontrakto ĉiu aliĝanta ŝtato ekspedas kaj enmanigas reciproke la poŝtajn sendaĵojn. La tarifo estas unueca, kaj por plifaciligi la manipuladojn, ankaŭ la koloro estas unueca (verda por presajo eksterlanda, ruĝa por poŝtkarto eksterlanda, blua por letero eksterlanda). Ĝis nun ekzistas ĉ. 75000 diversaj poŝtmarkoj, sed konsiderante la subsecojn, ilia nombro atingas 150000.

Multaj filatelistoj jam en la komencaj tempoj bone komprenis, kaj inde taksis tiun profiton, kiun donas al ili E. Preskaŭ de la unuaj jaroj pri E interesiĝis gravaj fil. gazetoj. La »Revue Philaélique Française« presis favorajn artikolojn pri kaj eĉ en E. »Les Archives des Collectionneurs« havis specialan E-rubrikon. »L'Echo de la Timbrologie« presis prop. artikolojn kaj plenan gramatikon de E. »L'Annonce Timbrologie de Bruxelles« alprenis E-n por interrilatoj kun fremdlandaj filatelistoj. Sur la paĝoj de multaj E-gazetoj senĉese estis presataj sennumbraj anoncoj de filatelistoj, dezirantaj korespondi en E kaj interŝanĝi. Sajne la filatelistoj la unuaj komprenis ankaŭ la necesecon de speciala fil. terminaro, ĉar ankoraŭ en 1903 R. Lemaire verkis francan-E fil. vortaron. Poste grava fil. firmo Sent en Leipzig en 1911 eldonis en kelkaj lingvoj, inter ili en E, tabelon de plej uzataj terminoj kaj esprimoj en filatelio kaj en 1926 aperis en HDE, poste en aparta libro Filatelia Terminaro de H. M. Scott en la lingvoj E, angla, franca kaj germana. La nombro de E-istaj filatelistoj estas sufiĉe granda, nur ili dividigas inter la diversaj societoj. En Argentina estas 6, en »Asociacion Filatelica« (Bahia Blanca), 14, en Iharos 27, en Kangaroo 24, en Shimb Club Romana 4, en Fusion 36, ktp. Aparta societo por E-istaj filatelistoj estas la

Tutmonda Asocio Kolektanta (v. Kolektado), kies organo, la Tutmonda Kolektanto havas ĉiam adresojn de interŝanĝemuloj. Multaj fil. adresoj estas troveblaj en BES-A'd-resaro, en la gazetoj JE kaj HDE.

La rubriko estas kunmetita laŭ la artikoloj de

I. SIRJAEV kaj J. TAKÁCS.

Filipira E-isto. Lando, kiu montratas plej bone, ke la disvastigo de la E-movado dependas ĉefe de certaj personoj, estas la Filipinaj Insuloj. Estis arma firiurgisto d-ro H. W. Yemans, kiu fondis en julio 1907 la FEA-n kaj eldonis en la sama monato »Philippines E Circular«. Jam en aŭg. ĝi fariĝis FE. Vol. 1.: aŭg. 1907—julio 1908—12 kajeroj 4×IV+2×VIII+6×XII+236 p. Vol. 2.: aŭg. 1908—julio 1909 7 kajeroj (11 n-roj.) 2×IV+136. Kiam Yemans post eksterlanda vojaĝo devis returni en la Usonan armeon, FE endormis.

P. TARNOW.

Filipinaj insuloj, Azio. La unuaj pioniroj estis (1901) d-ro Jemans, S. Garcia Roxas, f-inoj Felicidad kaj Maria Paz Zamora, ĉiuj en Manilla. Aktiva propagando kaj vigla agado montrigis en 1907, kiam estis fondita en Manilla ES, kiu eldonis la gazeton FE-isto. Samjare la administranto de Popola Klerigo, W. Shuster kaj komitatano pri la klerigado C. Torbes fariĝis membroj de la societo; granda ilustrita revuo »The Far Eastern Review« presis lecionojn de E, eĉ oni povis legi tiam pri lernejo, kie oni volas instrui E-n al lepruloj. Dum la sekvaj jaroj la movado preskaŭ tute formortis. Laŭ la Dietterlestatistiko en 1928 E-istoj nur en du lokoj. En 1933 UEA-del. kaj EG en Manilla.

I. SIRJAEV.

Filip Jan, ĉeĥo, teologia studento. Nask. 9 dec. 1911 en Pribyslav. E-isto de 1922. Jam kiel 13-jara junulo verkis E-kurson en pluraj gazetoj. Fondinto de pluraj E-rondetoj. Artikoloj, poemoj en pluraj E-gazetoj. Kompilis kaj parte tradukis: Kantareto, 1929, kaj verkis grandan E-Ĉ vortaron, 1930.

Filipov Aleks. Gavriloviĉ, ruso, dentkuracisto en Saratov, kie li estis unua pioniro de E, de 1888—91. Prop-artikoloj.

Filipov Georgij, ruso, sovetiano, scienclaboranto ĉe pedagogia instituto en Harkov. Nask. 1888. Faris gravajn studojn pri E kiel prepara ŝtupo por lernado de fremdaj naciaj lingvoj (v. respektivajn artikolojn en »Int. Lingvo«, ruslingva organo de SEU), organizis periodajn E-disaŭdigojn el Harkova radiostacio de 1927.

Filiatre (filiatr) Pierre, franco, ĉefkomizo de PTT. Nask. 2 okt. 1897 en Paris. Kun sia frato li starigis la fakan revuon »Le Relais«. Kun la frato fondis en 1922 kaj eldonas la E-an fakorganon Interligilo de PTT. La du fratoj verkis la PTT-artikolon de la Enciklopedio.

Filiatre Robert Julien, (ps. Hugues Lerisloy), franco, PTT-oficisto. Nask. 4 apr. 1900 en Paris. Ĉefred. de la franca revuo »Le Relais«. Verkis multajn studojn pri diversaj branĉoj de PTT. Gen. sekr. de ILEPTO, en kies organo La Interligilo de PTT li aperigis multajn artikolojn precipe teknikajn. Aŭtoro de la Poŝt-telekomunika Vortaro, 1934.

Filmoj. v. Sonfilmoj.

Filozofia Vortaro. Kompilis Stan. Kamaŕyt. 1934, 171 p. »La aranĝo de la artikoloj: Post la titolo sekvas la terminoj en angla, ĉeĥoslovaka, franca kaj germana lingvoj... Poste sekvas difinoj de la termino. Se ili estas pluraj, ili sekvas laŭeble laŭ la ordo de ilia graveco, ne laŭ la historia evoluo.« (El la Enkonduko.)

Findlay (findlej) Joseph John, anglo, d-ro, emerita prof. de edukado, Universitato de Manchester. Aŭtoro de multaj verkoj pri edukado kaj lingvolernado. Iniciatis la Findlay-Gregg sistemon de lernado de lingvoj (inkluzive de E) per gramofondiskoj, 1929.

Fine mi komprenas la Radion. Amuza kaj populara enkonduko en la radioteknikon. Originale en E verkis E. Aisberg, kun 245 bildoj kaj desegnoj de H. Guilhae. Konsistas el 16 »babiladoj«, el kiuj 8 aperis jam en Int. Radio Revuo, 1926. Tutteksta E-eldono; 1934, 140 p. La verko estas eldonita en lingvoj bulgara, ĉeĥa, estona, franca (11 eldonoj), germana (11 eldonoj), greka, hungara, itala, latva, rumana, rusa kaj slovena. En-

tute 13 lingvoj. El la esperanta eldono nun oni tradukas ĝin ankaŭ en polan anglan kaj svedan lingvojn.

Finholt Josefina, norvegino. Nask. 17 aŭg. 1857, mortis 3 marto 1921. Guvernistina kaj instruistina ekzamenoj. E-iĝis en 1908 kaj de tiam ŝi per tuta vivo kaj animo apartenis al E. Membro de gazeta komitato 1908, del. de UEA 1911, kunfondinto de NEL 1911, restarigis la EK en Oslo 1912, fondinto kaj sekr. de Asocio de N Geinstruistoj E-istaj 1915. Gvidis multajn kursojn 1912—18, i. a. la unuan por-infanan kurson en N. Ŝi entute gvidis kaj subtenis la movadon dum malfacilaj periodoj kaj antaŭ ŝia morto ŝi destinis sufiĉan kapitalon por pagi la eldonon de lernolibro de Rifling (5000 ekz.). Ŝia morto estis grava bato por la N E movado, kiu dum postaj 5 jaroj preskaŭ nur vegetis.

Finlando. La finnan lingvon parolas nur ĉ. 3 milionoj da homoj. En la finnaj lernejoj estas devige studataj minimume tri fremdaj lingvoj. La multlingveco de kulturo kaj komerco do kaŭzas por finnoj grandan malhelpon.

Estas neeble plu eltrovi, kiu estis la unua e-isto en Finlando. E atingis la landon jam en 1888. La plej mainova inter la nun vivantaj fideluloj, prof. G. J. Ramstedt, konatiĝis kun E en 1891. La unua e-ista klubo ekagis jam en 1893 inter studentoj de la Politeknika Altlernejo en Helsinko, sed ĝi ekdormis post du jaroj. En 1895, kiam »Esperantisto« pro la perdo de siaj rusaj abonantoj ĉesis aperi, el la tuta eksterruslanda abonantaro (170) en la malgranda Finlando troviĝis 12.

Disvastiĝon de la movado malhelpis la manko de finnaj lerniloj; la unuaj finnaj E-istoj studis la lingvon per svedaj lernolibroj. La unua finna lernolibro aperis nur en 1904. Tamen jam en la unua UK, 1905, estis reprezentanto de Finlando, d-ro Nino Runeberg, kiu e-istiĝis en Paris per prof. Cart.

Efektiva ekmarŝo kiel organizita movado komenciĝis en 1905, per fondo de »Klubo E-ista de Finnaj Studentoj«. En sekva jaro ĝi anoncis en

Helsinki kurson, al kiu aliĝis 208 personoj. Tiam fariĝis necese fondi novan ĝeneralan societeton »La Polusstelo«, kiu poste dum 15 jaroj estis la plej grava grupo en la lando, kun siaj eminentaj, agemaj anoj, inter ili stud. A. A. Sola dediĉis plej grandan parton de sia tempo al E, sed li mortis jam en 1909.

En 1907 estis fondata la tutlanda organizaĵo »E Asocio de Finnlando«, kies unua prez. estis d-ro Runeberg. Samjare naskiĝis la unua gazeto, Finna E-isto, kiu kun kelkaj interrompoj aperadis ĝis 1914. Por liverado de lerni'oj kaj literaturo estis, laŭ propono de Alb. Sandström, fondita komerca entrepreno, kooperativa societo »Iarejo E-ista«, kiu ankaŭ administris la gazeton ĝis 1909, kiam EAF prenis sur sin la eldonadon de »Finna E-isto«.

Iom post iom la E-istaro kreskis, societoj fondiĝis kaj kelkaj fakaj rondoj komencis utiligi E-n en siaj int. rilatoj. I. a. la turisma organizaĵo »Suomen Matkailijayhdistys« eldonis 64-paĝan libron »Vojaĝado en Finnlando«, kaj sendis en 1914 Vilho Setälä al paroladvojaĝo por fari turisman propagandon eksterlande per E.

La mondmilito interrompis tiun vojaĝon, kiel ankaŭ la tutan movadon. Kvankam Finnlando havis relative vastan aŭtonomion kaj ne devis partopreni en la milito, la rusaj oficialuloj tamen povis malhelpi la E-istan agadon. Sed tuj post la rusa revolucio en 1917, kiu kreis pli liberajn cirkonstancojn, la movado reviviĝis, kaj post kiam Finnlando en 1918 fariĝis memstara respubliko, ĝi disvolvis belan floradon.

Vilho Setälä kun juneca fervoro subite sukcesis reveki malnovulojn kaj varbi novajn adeptojn. Li verkis kompetentajn lernolibrojn kaj vortarojn, kiuj estis uzataj ankaŭ en najbaraj landoj. En 1920 li fondiĝis kaj redaktis unike bonan gazeton E-a Finnlando, kiu en sia plej bona tempo havis unu abonanton por ĉiuj 4.000 loĝantoj en la lando. Apud li staris aktiva stabo, el kiu aparte menciindaj estas Alb. Sandström, Leo Jalava, Sulo Attila kaj G. Černošov, ĉiuj en Helsinki, kaj plue la

fervora prop-isto, ŝtaciestro H. Salokannel.

Nun sekvis unuaj oficialaj rekonaj. En 1922 la parlamento decidis doni al E Instituto de Finnlando ŝtatan subvencio de 25000 f. markoj. La Instituto ricevis saman sumon ĉiujare ĝis 1932, kiam la registaro en sia »kriza budĝeto« reduktis la subvencio al 17.700 f. m. Krom tio, la ŝtato cedis speciale por la XIV-a UK en 1922 50.000, la urbo Helsinki 10.000 markojn.

La movado trovis ankaŭ fortan spiritan simpatian ĉe oficialaj kaj duonoficialaj institucioj. En 1920 la Lerneja Administracio permesis la instruadon de E kiel fakultativa lernoobjekto en ĉiuj lernejoj, kie la rektoroj tion proponas; malpli favora sinteno de pli postaj registaroj en praktiko parte nuligis la utilon de tiu permeso. Tamen E estis instruata en pluraj gimnazioj.

Tre gravaj estis la servoj, kiujn la Finnlanda Foiro kaj E reciproke faris unu al la alia; i. a. la Foiro dungis specialan E-sekretarion, Konrad Ojala, kaj publikigis en E verkon pri la ekonomia vivo en Finnlando.

Tia estis la situacio en 1922, kiam la UK okazis en Helsinki. Por la kongresaj laboroj estis mobilizataj preskaŭ ĉiuj aktivaj E-istoj. La kongreso ankaŭ sufiĉe bone sukcesis, la aranĝoj estis ĝenerale laŭdataj.

Sed en la fino de la kongreso montriĝis politika malkonsento inter kelkaj funkciaj, kaj tio havis fatalajn sekvojn por la bele kreskanta movado. La ĝis tiam unueca fronto disfalis. Parto de la anoj ekŝiĝis el EAF kaj organiziĝis en Laborista E Asocio. La skismo per si mem ne estus ia granda malfeliĉo, sed la tuta E-istaro en Finnlando ankoraŭ ne estis tre forta, aŭ kvalite aŭ kvante. Ĉiuj aktivuloj estis troalcigitaj en la kongresaj laboroj.

Ĉar la skismo okazis ĝuste en tiu momento, ĝi paralizis la tutan movadon, kaj de tiam ĝi stagnas en la lando. Kaj sensacisioifaj taggazetoj donis al la publiko kalumniajn raportojn pri la okazintoj. Tial E perdis simpatian ĉe influrika parto de la publiko kaj la propagando mal-

faciligis. Grave estas ankaŭ, ke V. Setälä, ĝis aŭtuno salajrita oficisto de EAF, plu ne povis dediĉi sian tutan tempon por la gvidado de la movado.

Kvankam ĝis nun oni ne sukcesis plivigli la movadon, parte pro la ekonomiaj malhelpoj de la kriza tempo, oni certe fine antaŭenigos Finnlandon al sama vico kun la aliaj nordaj landoj, kiuj nun multe superas Finnlandon.

Societoj. E Asocio de F. (EAF) Fond. 1907 de Hj. J. (Nino) Runeberg, Sola, Werner Anttila, Attila, Sandström, Jalava, Salokannel k. a. Enspezoj nur per kotizoj. Ĝiajn kursojn partoprenis ĉ. 3.500 personoj. Nombro de anoj ĉ. 50. Prez. Salokannel, vicprez. Ilmari Rautio, sekr. J. Mikkola, kas. f-ino Helmi Koivuniemi, ceteraj estraranoj: s-inoj Elmi Tamminen kaj Ida Sairanen, T. Aurela, T. Auer, Leo Rautanen, s-ino Maikki Romppanen kaj Erkki Turunen. Organo 1907—14 »Finna E-isto«, 1920—22 »E-a Finnlando«; nuntempe ne ekzistas gazeto. Al EAF faris donacojn firma Aarnio kaj Lehtinen. konsulo K. T. J. Kuntsi kaj direktoroj Kilpi kaj L. Laiho. — F-a Laborista E-Asocio. Fond. 1923 de V. J. Kostiainen, O. Laukkanen, H. Koivu, A. Lundström k. a. Laŭ ĝia propono la socialdemokrata partia kongreso en 1930 akceptis rezolucion pri E, sekve de tio ekz. la partiaj gazetoj devas publikigi prop. artikolojn. Prez. Kostiainen, sekr. Lundström, ceteraj estraranoj: Edv. Manner, Tuomas Vanhala, John Vainio. E-Ligo de F-aj Instruistoj. Fond. 1921. 43 anoj (28 viroj, 15 virinoj). Kurso en 1923, subvenciata de la ŝtato per 6000 markoj; gvidantoj Setälä kaj Huuskonen, 43 personoj. Dua kurso en 1932, sub gvido de hungaro T. Czitrom. Prez. Tamminen, vicprez. Mikkola, kas. J. O. Metsikkö, sekr. Tyyne Leivo, ceteraj: Kalle Huuskonen, Rautio, Koivu. — E Societo de F-aj Fervojistoj. Fond. 1922. Grava venko: enkonduko de du lecionoj pri E en fervojistaj fakaj kursoj en Helsinko. Prez. Salokannel, sekr. kas. T. A. Lindberg, ceteraj: S. B. Veijola kaj

A. Salonen. — E-Instituto de F. Fond. 1921 de EAF. Enspezoj: ŝtata subvencio, kurspagoj, perado de literaturo, gaze'oj ktp. Elspezoj: luo por kontoro, honorarioj, preskostoj ktp. En 1923 estis fondata Subtena Societo de Instituto, al kiu aliĝis ĉiuj E societoj en F, kiuj elektas la estraron de Instituto. Estraro: Tamminen, Kostiainen, Mikkola, Lundström, Hj. Lillqvist, direktoro de post la fondo Setälä. Ĉiujare kursoj. Post ekzameno diplomoj: 24 superaj, 163 elementaj, 14 provizoraj, 2 skoltaj, 8 korespondaj. Plej multajn kursojn de la Instituto gvidis Huuskonen, unua faka E instruisto en F.

Literaturo. Aŭtoroj de lerno-libroj: la unua de Laurén kaj Kuntsi en 1904, poste de W. Anttila (Andelin), Setälä, Salokannel; aŭtoroj de vortaroj: Anttila (F-E, E-F), Setälä (F-E, E-F). Pli gravaj tradukaĵoj et la finna literaturo: novelo de Linnankoski, trad. de Setälä, komedio de Kivi, trad. de Hilma Hall, du teatraĵetoj, trad. de Ekström kaj Hall. Tradukaĵoj el E en finnan: Forge, Abismoj; Argus, Pro kio, ambaŭ trad. de Aini Setälä. Laiho kaj Delsudo, Aŭstralia, trad. de Laiho.

Noto. La artikolo estas verkita per multa helpo de f-ino Tyyne Leivo. D-ro L. I. LAPPI.

Firu Petro, ps. de Henriko Rabinovici, rumano, arkitekto. Nask. 10 jul. 1907 en București. E-isto de 1924. Liaj tradukoj el la rumana literaturo aperis en diversaj E-gazetoj (1928—32); en kunlaboro kun Pragano aperis de li en libroformo: Rumana Bonhumoro, 1932. Verkis la unuan R-E vortaron, 1932.

Fischer (fiŝer), Ottmar, d-ro, inĝeniero, kemiisto. Nask. 12 apr. 1904 en Temesvár en Hungarujo (nun Timiŝoara en Rumanujo); la patro estis germana, la patrino hungara. Artikoloj por kemiaj gazetoj; bonfara laboro inter blinduloj. E-isto de 1927. Vizitis la int. ped. kurson de A. Cseh en Arnheim, jul. 1930. Li instruis E-n laŭ Cseh-metodo dum 2 jaroj gvidante 36 kursojn (ĉefe en Norvegujo) kun ĉ. 1500 partoprenantoj kaj faris 50 prelegojn en E antaŭ ĉ. 5000 per-

sonoj. Partoprenas ankaŭ la skoltan E-movadon.

Fischer-Galati (fiŝer-galac) Henriko, rumano, eldonisto kaj presisto en București; ĝis 1926 grandindustriisto. Nask. 3 jul. 1879 en Galati. E-isto de 1902. Gvidis multajn kursojn, kunvenojn kaj kongresojn. De 1904 prez. de Unua Rumana Societo E-ista en Galati, de 1908 de la Federacio de ES-j en R., de li fonditaj. Prez. de RES de 1923. Red. de Rumana Gazeto E-ista. Eldonis la rumanan ŝlosilon, diversajn lernolibrojn, propagandilojn. LK de 1908. Oficiala reprezentanto de la rumana registaro dum pluraj UK-j. Kondukas de 1922 ECR, fonditan de li kun helpo de A. Cseh, en propra domo kun biblioteko, kurso, librovendejo, presejo E-istaj. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Fiŝer Andreo, ruso, d-ro, kuracisto en Orel, Tiflis, fine ĉefkuracisto en akuŝista instituto en Leningrad. Nask. 1855 en Orel, mortis 27 majo 1930 en L. E-isto de 1892 kaj de tiam senlace laboris por ĝi. Kunfondis kaj prezidis multajn jarojn la Kaŭkazan ES-n. Partoprenis multajn UK-jn. Tradukoj en libroformo: Kanto de triumfanta amo, 1908, Anjo, 1910 Fantomoj, 1912, ĉiuj tri de Turgenjev, Portreto de Gogol, 1911, Trinoveloj de Puŝkin, 1923. Kompilis legolibron, 1910 kaj Historieton de E, 1911, kaj lernolibron por armenoj. Kunlaboris je 'E', La Bela Mondo, Universo, Danubo, Literatura, Juna E-isto, La Ondo de E.

Flageul (flajöl) Pierre, franco, oficisto en la nacia monfabrikejo, kaj, flanke, prof. de stenografio. Nask. 4 okt. 1878 en Maumusson (apud Nantes). Li tre interesiĝas pri stenografio, gvidis kursojn, fondis societojn, kunlaboris al multaj sten. gazetoj, adaptis la sistemon Duployé al la skribo Braille, kaj poste al E. Li gvidis kursojn E-ajn en Paris kaj la ĉirkaŭo, faris konstantan propagandon en la sten. medioj per multaj artikoloj, per paroladoj, kursoj, proponoj favoraj al E en francaj kaj int. kongresoj. Li verkis, skribis kaj presis mem multajn lernolibrojn, propagandilojn, kaj

eldonis gazeton *Fluganta Skribilo* (v. Stenografio). Jus estas fondita nova Societo »Stenografista Instituto Tutmonda« (STT), kiu celas disvastigon de la Stenografio Duployé-Flageul. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Flandra Esperantisto. Organo de FLE, fond. en 1929; formato 27×18 cm. Red. Jan van Schoor.

Flasch (flaŝ) Hellwig, Brunhilde, aŭstro-germano, d-ro, prof. en Wien. Nask. 15 marto 1896 en Suczawa (tiam Bukovino). Ŝtata ekzamenkomisionano por E, de 1928. Kunlaboranto de Aŭ. E-isto kaj antaŭe de AKLE-Infoj. Originalaj poemoj kaj tradukaĵoj.

Flatauer Otto, germano, direktoro kaj posedanto de du privataj komercaj lernejoj en Berlin. Nask. en 1880, mortis 4 jan. 1928. Enkondukis E-n kiel laŭplanan fakon en siajn lernejojn. Artikoloj, ĉefe en la taggazeto *Berliner Tageblatt*. Provis krei mondoteatron per E.

Floretoj. Porinfanaj rakontoj, trad. de la Vendreda Klubo en Winschoten. 1931, 64 p. »Ok fabeloj, arte ilustritaj, diklitera, klara preso, modela aranĝo«. (Butin, HDE, 1931, n-ro 14.)

Flourens (fluran) Jeanne, (ps. Rok-sano), francino, komercistino. Nask. 4 aŭg. 1871 en Vias (apud Montpellier), mortis 13 jul. 1928 en Marseille. E-iĝis en 1903, kaj ne ĉesis propagandi ĝis la morto. Fondis grupon en Béziers, gvidis kursojn, varbis la estrojn de la lokaj gazetoj, en kiujn ŝi enpresigis regulajn artikolojn por E. En 1922 ŝi translokiĝis al Marseille, kie ŝi daŭrigis la laboron kaj direktis E-Hejmon. Sed precipe kiel verkistino ŝi estas konata; ŝi skribis senombrajn prop. artikolojn, kaj ankaŭ multajn aliajn ĉiuspecajn en E-aj gazetoj, precipe literaturajojn, tradukojn kaj pri la modo. Plie ŝi verkis kaj publikigis aparte: *Duonsurda*, komedioto, 1907. *La Fianĉiniĝo de Sovaĝulineto*, komedio, 1909. *La Senlaca Sinofero*, 1911. *La Morgaŭa Virino* 1912. *Eltiraĵo el la memorskriboj de Tolstoj* 1911. L. K. de 1910.

L. BASTIEN.

Flower (flaŭer) Isaac, anglo, vestaj-tranĉisto. Nask. 31 marto 1931 en London. E-isto kaj SAT-ano de 1923. Sekr. de lab. EK en London, 1923—29, de BLEA ĝis 1929. Poste loĝis en Götterborg (Sved.), Haarlem (Ned.) kaj Mecklenburg (Germ.), laborinte ankaŭ por E. Reveninte al L. gvidis kursojn kaj en 1932 fariĝis sekr. de la brita SAT-organizo. Artikoloj en S-ulo.

Fluganta Skribilo. Gazeteto stenografia laŭ la Duployè-sistemo, Red. P. Flageul (Issy). Eld. de 1913. Trimonata.

Flugel John Carl, anglo, prof. en Londona Universitato. Nask. 13 jun. 1884 en Liverpool. Verkisto pri psikologiaj temoj. Prelegis ĉe Somera Universitato, UK Genève, 1925.

Foehr (föör) Karl, germano, dir. de komerca kaj industria altlernejo en Köthen-Anhalt. Nask. 25 marto 1860 en Stuttgart, mortis 21 apr. 1930 en Freiberg. E estis lernofako en lia altlernejo. Paroladoj, vizito de UK-j.

Fotroj. v. Komerco.

Fokso-Nukso. Memorinda, instrua kaj averta rakonto de Ignát Herrmann, trad. Moraviaj E-Pioniroj. 1932. 65 p. »Majstroverketo pro la lerta kombino kaj evoluo. Traduko laŭdinda.« (Butin, HDE, 1933, n-ro 1.)

Folioj de la Vivo. De Rusinol, el la kataluna trad. Sabadell. 1910 (?), 104 p. »Tute interesaj kaj tradukindaj skizetoj. La stilo estas facila. Bona, klara estas la traduko.« (Th. C., L. I, 1910, p: 46.)

Foltanek Rudolf estas librejo en Wien kun E-lako. Ĉefdeponejo de F. Hirt por Aŭstrio kaj Hungarujo.

Fonografo, v. Gramofondisko.

Font Cantallops (kanta'ops) Bartolome, hispano, katolika pastro. Nask. 20 okt. 1871 en Llumayor, Balears. Stariginto de la vilaĝo San Serriol, kie strato nomiĝas E kaj p aco Z. Fondis la grupon EK Palma (1907).

Font-Giral Joan, hispano, pastro, prof. en la Seminario-Kolegio de S. Maria del Collel. Gvidanto de la katolika E-movado. Prez. de IKUE; red. kaj eid. de Espero Katolika, de 1932. Cestis plurajn UK-jn kaj aliajn kongresojn. Bona oratoro.

Forel August, sviso, kuracisto, mondfama scienculo. Nask. 1848, mortis 27 jul. 1931 en Yverne. »Lia plej konata libro La seksa problemo... Diru la veron sen ĉirkaŭfrazo, sed kun luma pureco, honesta malkaŝemo kaj scienca tekniko, tamen scianta resti homa kaj simpatia, jen la maniero, en kiu F. sukcesis verki tiun libron... En la scienca mondo eĉ pli konsiderataj estas liaj laboroj pri la homa cerbo, kium li volonte komparis kun tiu de la formikoj... Gvidanto de la kontraŭ-alkohola movado... Li verkis egalbone france aŭ germane... Fideia membro de UEA, al kiu li regule pagis sian kotizon, F. subtenis nian movadon, en kiu li vidis grandan ilon por forigi malsagajn barilojn inter homoj kaj popoloj.« (P., E, 1931, p: 137.)

Forge Jean, ps. de verkisto Jan Fethke, polo, filmreĝisoro. Nask. 26 febr. 1903 en Oppeln. Kiel politeknika studento li ankaŭ laboras en redaktejo de Danzig-a taga ĵurnalo. Poste en Berlin li estis reĝisoro asistanto ĉe la fama Universum Film A. G. (UFA) kaj redaktoro de fakrevuoj en Paris, Warszawa kaj Berlin. De 1928 aperas liaj filmoj, inter ili la plej sukcesaj: »Transe de la strato« kaj »Vojaĝo de Panjo Krause en feliĉon.« E-isto de 1919. Fininte siajn gimnaziajn studojn, li estis redaktanto de E Triumfonta. F. aktive partoprenas la polan E-movadon. En 1931 varbis por E la negron Kola Ajayi kaj preparis lian grandsukcesan prelegvojaĝon. Komence de 1932 gvidis sukcesajn Cseh-metodajn kursojn en Svedlando. Lia unua romano, verkita dum la knabaj jaroj, aperis en 1921 germanlingve. Liaj plej gravaj verkoj estas Abismoj (1923) kaj Mr. Tot aĉetas mil okulojn, (1931) tradukitaj en kelkajn lingvojn. En la unua, kiu estas priskribo kaj profunda analizo de animkonfliktoj, jam aperas la plej granda forto de la Forge-aj verkoj, la originala formo, la figuroj mem parolas pri si kaj pri siaj problemoj; la formo kaj la inventema rakontmaniero donas al tiu verko gravan signifon en la E-a literaturo. Lia dua verko: Saltego trans Jarmiloj (1924) estas ra-

konto pri revojaĝo al la pasinto, malgraŭ ĝiaj specialaj humoro kaj aliaj allogaĵoj ne atingas la nivelon de la ĵus citita verko. Ankaŭ la tria, plej nova verko: »Mr. Tot aĉetas mit okulojn« estas fantazia aventur-romano, tamen la absoluta arto de la karakterizado, la pure literatura lingvo kaj la bona konstruo de la romano levas ĝin alte el la amaso de la similspecaj romanoj. El tiu romano malaperis la iama trouzado de la sufiksoj, kiu cetere pleje estas konstatabla en la »Saltego«.

F. SZILÁGYI

For la Batalilojn. Romano de Bertha von Suttner, el la germana trad. Caumont, 1914, 320 p. Nominad: Biblio de la paco, tradukita al multaj lingvoj. Akra protesto kontraŭ la kruelaĵoj de la milito; terurigaj bildoj pri la suferadoj kaj detruoj. Modela stilo de la E traduko.

For la Neŭtralismon! Devizo de plejmulto el la klasbatalaj E-istoj, laŭ kiu ili ne partoprenas en la neŭtrala E movado. Samtitole presigis broŝuro de E. Lanti, (1922, 16 p.), aperinta en pluraj eldonoj kaj en diversaj lingvoj.

Formortinia Delsuno. Rakonto de R. Vermandere, el la flandra trad. Oscar Van Schoor, 1910, 119 p., kun 18 bildoj. »Mortinta bakisto spirite vizitante iaman amikon rakontas al li la historion de sia morto kaj enterigo, klarigante la pensojn kaj motivojn de la tiamaj funebrantoj.« (A. E. W., British E-ist, 1911, p: 73.)

Forster Jenő, hungaro, tajloro. Mortis 66-jara en Budapeŝt 14 okt. 1919. Kasisto de HES dum multaj jaroj. Trad. la romaneton Fantomo en Lubló de Mikszáth. »Pro E li ofte ne zorgis pri sia propra tajloro negoco, kio kaŭzis multan ĉagrenon al lia familio« (H. E-ist o, nov. 1919.)

Förster Friedrich Wilhelm, germano, d-ro fil., prof. por etiko kaj sociaj sciencoj en München kaj Berlin. Nask. 2 jun. 1869. Emiencinto en sia fako. Li estis ano de la Delegacio por alpreno de L I, sed kiam la delegacio alprenis Idon, li ekzigis

kaj publikletere pledis por E. Aktiva rolo por E dum la Int. Packongreso en München.

Framasonoj. »Komuneco de libere pensantaj homoj, kunigataj en loĝioj. La deveno estas de mezepokaj gildoj de la masonistoj. La konstruado estas komprenata laŭ morala senco. Konstitucio 1721 verkita de Anderson. Pro politikaj kaj religiaj konsideroj ofte atakataj.« (UEA-1928.) Jam dum la 1-a UK 1905 oni fondis Universalan Framasonan Ligon kaj ankaŭ dum aliaj UK-j la framasonoj aranĝis fakkunvenojn, ekz. dum la 7-a UK kun helpo de la lokaj loĝioj. En 1907 svisaj framasonoj (Bern) decidis larĝe uzi E-n por int. rilatoj, tiucele estis eldonita en E broŝuro kaj dissendita tra la tuta mondo, sed mankas informoj pri la efektiva uzado.

Franca Esperantisto. Kiam en junio 1908 de Beaufront, prez. de SFPE transiris al Ido, tiu societo trapasis gravan krizon. La plej multo de la francaj E-istoj tamen deklaris sin por E kaj intertraktis por anstataŭi la societon per »Fédération de France« kaj la gazeton L' E-iste per FE. En dec. 1908 jam aperis la 1-a n-ro. Ĝi ĉesis en dec. 1912 kaj reapiris post la mondmilito de apr. 1920—dec 1921. IV—VIII+16—24 p. 25×19. Ĉefred. antaŭ la milito F. de Ménil kaj post la milito Th. Cart. FE estis precipe prop. gazeto, enhavis nur malampleksan lit. parton. — FE reapiris en 1933.

P. TARNOW.

Francujo. En la unua Adresaro en 1889, enhavanta la nomojn de la mil unuaj E-istoj, troviĝas la nomoj de Louis de Beaufront, instruisto en Rumont, apud La Chapelle la Reine, de Henri Detachaux, desegnistogeografiisto en la librejo Hachette, kaj de Demonget, kiu publikigis en 1889, en la librejo Ghio, sub la titolo »Internacia aŭ Volapuk«, la tradukon de broŝuro de L. Einstein.

Beaufront aliĝis al E en 1888, Demonget en la komenco de 1889 kaj en la somero de tiu sama jaro Gaston Moich, oficiro en Lorient.

Dum multaj jaroj Beaufront povis fari nur propagandon »indivduan«, tre efikan sed kompreneble tre malrapidan. Ĉar la maturaj homoj

konvinkigis tre malfacile, li devis turni sin al la junuloj kaj infanoj, kaj en 1892 li varbis René Lemaire, de Epernay, kiu fariĝis iom post iom lia plej fidela kunlaboranto. Dume, Beaufront tradukis en francan lingvon verkojn de Z kaj publikigis en Epernay lernolibron.

En 1897 Moch publikigis ĉe Girard et Brière, grava pariza eldonisto, broŝuron, (aparta represo de artikolo el la »Revue Int. de Sociologie«) kies plano kaj argumentoj estis poste centfoje reuzataj de la verkantoj de broŝuroj aŭ paroladoj por propagando. Li publikigis ankaŭ similan artikolon en la »Revue des Revues«, kaj tiuj publikigoj intertratis lin kun Henri Bel, bibliotekisto de la Universitato de Montpellier, Gariel, sekretario de la »Association française pour l'avancement des Sciences«, d-ro Javal, Th. Ruysen, generalo Sebert, Tarbouriech, Tenneson, Fried, Moschelles, senatano Lafontaine (de Bruselo) ktp. Leŭtenanto Lemaire baldaŭ poste publikigis en Belgujo prop. broŝuron «imi'an al tiu de Moch.

Samepoke Emile Lombard, prof. de germana lingvo en la liceo Michelet, en Paris, kiu ĵus fondis monatan multlingvan revuon »L' Etranger«, tre bonvole akceptis en tiu revuo artikolojn pri kaj en E. Tiej artikoloj varbis f-ino Alice Roux, prof. de germana lingvo en la gimnazio de Louhans (Francujo), kiu konigis E-n al lernanto de la knaba samurba gimnazio Gabriel Chavet, kaj en jan. 1897 Chavet fondis en Louhans la unuan francan E-istan klubon.

En tiu epoko ekzistis en la tuta mondo ses E-istaj kluboj: en Nürnberg, Petrograd, Odessa, Uppsala, en Danujo kaj en Louhans, (Saône-et-Loire).

Beaufront havis poste la ideon grupigi en unu sola societo ĉiujn personojn, kiuj interesiĝis pri E kaj en jan. 1898 aperis la unua numero de la revuo »L' Espérantiste«, kiu anoncis la fondon de »Société pour la propagation de l' Espéranto« (SPPE). Ĝi estis int. societo, sed ĉar ĉiu prop. societo povas agadi nur pere de naciaj lingvoj, la SPPE,

kvankam akceptante anojn de ĉiuj landoj, propagandis pere de franca lingvo. En la Komitato troviĝis Beaufront, prez. René Lemaire, sekr. Henri Hamel, Bel, L. Demarest, lernejestro, E. Roux de Grenoble, leŭtenanto Lemaire, Lombard kaj Moch. E. Roux faris, en tiu tempo, en Grenoble, sub la protekto de la Asocio de Komerco kaj Industrio, la unuan publikan kurson de E en Francujo.

En feb. 1898 okazis, por la unua fojo, gazetaj polemikoj pri E inter fama ĵurnalisti Fr. Sarcey kaj Chavet, en »L' Etranger« (Chavet) »La Dépêche de Toulouse« (Sarcey), »Le Petit Méridional« (Chavet) »Le Rappel« (Sarcey) kaj »Le Petit Méridional« (Beaufront). La sekvanta jaron la svisa filozofo Naville prezentis E-n al la Franca Akademio de Sciencoj moralaj kaj poŭitikaj, kaj tiu fakto naskis malfavoran artikolon de literaturisto André Theuriet, en »Le Journal«. Dume, kursoj organiziĝis en Limoges (Canet), en Lille (Louvre), en La Rochelle (Samuel Meyer). Beaufront konigis en Francujo la E-istan insignon, medaleton kun verda stelo sur blanka fono, fabrikatan de rusa E-ista juvelisto Stalberg, insignon kiu montriĝis necesa, kiam oni ricevis la viziton de alilanda E-isto.

La jaro 1900 estis tre fruktodona. En feb. Charles Lambert, katedrestro en la Universitato de Dijon faris en tiu urbo paroladon pri E, kiu varbis Charles Méray, fama matematikisto, kiu, siavice, varbis multajn scienculojn, inter kiuj estis Ch. Laisant kaj Carlo Bourlet. Poste okazis kurso en Dijon.

31 marto 1900 Moch faris paroladon pri E en la Lernejo pri Ĵurnalismo en Paris. Post la parolado multaj ĉeestantoj kuniĝis en la skribĉambro de la sekr. f-ino Dick May kaj decidis fondi Grupon E-istan, kiu ĝis tiu dato ne ekzistis en la ĉefurbo.

Je tiu epoko la parizaj anoj de la SPPE estis apenaŭ kvindek kaj ilia kunvokado montris, ke ili apartenas al ĉiuj klasoj de la socio. Post du preparaj kunvenoj la Pariza Grupo estis fondita kun la jena estraro: Moch, prez., Chavet, sekr.-kas., f-ino Roux, Laisant, Voisin, Tarbouriech, d'Eys-

sautier, Tenneson kaj Jean Frehis, anoj de la Komitato.

Kun la fondo de la Grupo de Paris komenciĝis la varbado de multaj samideanoj, kiuj posedis aŭ oficialajn postenojn aŭ gravan socian influon, kaj la propagando fariĝis pli ampleksa, pli solida kaj pli efika.

En la granda Tutmonda Ekspozicio, kiu okazis en Paris en 1900, la SFPE ne povis partopreni pro la nesufiĉeco de siaj monpovoĵoj kaj influoj. Sed la rusa ES »Espero« havis ĉambron en la rusa ekspozicio de la Palaco de Eduko kaj Instruo. Multaj E-istoj vizi is tiun ekspozicion, kaj okaze de tiuj vizi'oj renkontiĝis diverslandaj samideanoj, kiuj povis provi per interparolado la uzeblecon de E.

La 21 jul. 1900 okazis en Paris la unua E-ista vespermanĝo sub prezido de Beaufront; la partoprenantoj estis naŭ.

Dum la Ekspozicio E estis prezentata en multaj int. kongresoj, kiuj kunvenis en Paris je tiu okazo, ĉu senpere de Beufront, Méray, Laisant, ktp., ĉu de la fondintoj de la Delegitaro por alpreno de lingvo helpa int. Inter tiuj Kongresoj, en kiuj, por la unua fojo, oni parolis pri E, ni citu la jenajn: Kongreso de vivantaj lingvoj, Kongreso de Filozofio, Kongreso de Asocio por progresigo de Sciencoj, Kongreso de Matematikistoj, Kongreso de Kompara Historio, Kongreso de Teknika Instruo, Kongreso de Sindikaj Ĉambroj kaj Francaj Komercaj Ĉambroj en la fremdaj Landoj, Kongreso de Socia Instruo, de la Instituto de Sociologio, ktp.

En la Kongreso de la Asocio por progresigo de Sciencoj Beaufront komunikis la faman raporton pri Esenco kaj evoluo de la lingvo int. (subskribita de Unuel (v.)

Je tiu epoko aperis en Paris nova lingvo int. la »lingvo blua« de Bollack, riĉa komercisto, kiu elspezis multe da mono por publikigi dikajn librojn de gramatiko kaj vortaro. Tiu lingvo estis tiel stranga kiel volapuko, sed malpli scienca. Pli riĉa ol la E-istoj, Bollack povis havi en la Palaco de la socia Eduko de la Ekspozicio grandan standon, tenatan de

oficisto vestata blue, kompreneble.

En 1900 aliĝis al E Paul Fruictier, tiama studento de medicino, kiu poste ludis gravan rolon. Kaj je la fino de 1900 fondiĝis nova grupo en Dijon, kiu rapide grupigis grandan nombron de anoj; la tuta urbo Dijon konatiĝis kun E, dank' al la klopodoj de univ. prof.-oj Méray, Lambert, Lallemand.

Ankaŭ en la fino de 1900 aperis artikoloj en la monata revuo de la plej grava franca turista asocio la »Touring Club«, kiu grupigis pli ol cent mil anojn. La publikigo de tiuj artikoloj, verkitaj de Laisant, Gariel, Lambert, havis plej gravan influon sur la progresigo de la propagando. En komenco de 1901, prof. Bourlet, publikigis en tiu »Revue du Touring Club« sian unuan artikolon pri E.

En apr. 1901, Generalo Sebert, ano de la Akademio de Sciencoj, prezentis al tiu Akademio E-n kaj tiamaniere havigis al E la subtenon de multaj scienculoj; tiu prezento naskis multajn favorajn notojn en la scienca gazetaro.

La »Touring Club«, dank' al la insisto de Bourlet, decidis labori tre efike por E. La 29 apr. 1901, Beaufront faris publikan kurson en la sidejo de tiu societo. Ĉar la lernantoj estis tro multaj, oni devis organizi duan kurson, faratan de Bourlet, kiu havis inter siaj lernantoj Baronon de Menil, (verkonton de la muziko de la Espero), Buisson, ĉefstenografiiston de la Ĉambro de deputitoj, k. a.

Th. Cart, prof. de germana lingvo en liceo Henri IV sekvis kelkajn kursojn de Bourlet, sed por rapide perfektigi sian konon de E li petis de Chavet privatajn lecionojn. »L'Espérantiste« de sept. 1901 sciigis, ke Bourlet kaj Cart ricevis la Ateston pri Kapableco.

Méray propagandis E-n en Lyon kaj varbis la univ. prof. Offret; Emile Boiraç, rektoro de la Universitato de Grenoble (poste de Dijon), nove varbita, sendis en E cirkuleron por konigi la kursojn por fremduloj organizataj de la Universitato de Grenoble, montrante per tiu ekzemplo, ke oni povas praktike utiligi E-n; Paul Jobart, presisto en

Dijon, prezentis E-n en la Kongreso de la majstroj-presistoj; kaj en julio 1901, la estraro de la EG en Paris estis tiel reorganizata: Prez. Bourlet; vicprez. Cart kaj Laisant; sekr. Chavet. Kun la elekto de Bourlet nova tre brila periodo komenciĝas por la franca propagando.

Ĝis tiu dato, la nacia propagando de SPPE konsistis nur el la publikigo de la monata bulteno L' E-iste kaj de instruaj verkoj de Beaufront, el la starigo de servado de librovendo, el organizo de ekzamenoj kaj literaturaj konkursoj, publikigo de prop. folioj kaj broŝuroj.

Beaufront, gubernisto de infanoj el riĉega familio disponis tre malmulte da tempo por okupiĝi pri ĝenerala propagando kaj preskaŭ lia tuta tempo estis uzata por redaktado de la bulteno kaj de verkoj.

La buĝeto de la Societo, je la 15 sept. 1901 montras, el elspezoj de 956,65 fr. la solan sumon de 9,85 sub la rubriko »propagando«. Ĉiuj aliaj elspezoj estas dediĉataj al aĉeto de la »Commentaire sur la grammaire« de Beaufront, al publikigo de L' E-iste. En sept. 1901 eniras en la komitaton de la Societo novaj anoj, inter kiuj Bourlet kaj Fruictier.

Tuj post sia elekto je la prezido de la Grupo de Parizo, Bourlet — tiu tre influa persono — ricevis tri venkojn. Unue, li havigis al la Grupo la permeson fari siajn kunvenojn en ĉambro de la Sorbonne (palaco de la pariza Universitato), kaj tiu permeso estis tre multvalora ne nur en si mem, sed ĉar ĝi ebligis la havigon de similaj permesoj en aliaj urboj por kursoj kaj kunvenoj en oficialaj ejoj.

Poste Bourlet metode organizis la agadon de la Touring-Club kaj dank' al li, tiu potenca societo organizis novajn publikajn kursojn faritajn de Cart, Clarac, Wintzweiler kaj Chavet. La grupo de Paris havis sian sidejon en la loĝejo mem de la Touring Club. La Touring Club organizis paroladojn en ĉiuj provincaj, aranĝitajn de siaj provincaj delegitoj, donacante subvenciojn al la nova grupoj.

Fine, Bourlet klopodis ĉe la fama firmo Hachette, por ke ĝi unue publikigu paĝon pri E en sia Almanako, tre populara libro, kiu vendiĝis ĉiujare en multegaj ekzempleroj, kaj por ke ĝi poste starigu tutan servadon de E-istaj eldonoj.

La firmo Hachette faris kontrakt-ojn kun Z kaj kun Beaufront, ne por monopoli E-n, kiel oni malvere diris, sed por ebligi la regulan publikigadon de multaj E-istaj verkoj en speciala »Kolekto aprobita de D-ro Zamenhof« kaj tiu raporto donis ĉiujn garantiojn pri la lingva valoro de tiuj publikigaĵoj. Samtempe Z ne »vendis sin« al Hachette, kiel oni senhonte diris, sed rezervis al tiu firmo la monopolon de la publikigo de siaj personaj verkoj.

(Estas interese, ke Z cedis al Beaufront $\frac{1}{3}$ de la sumoj, kiujn li ricevos por sia korektlaboro de la aprobitaj verkoj; krome, post la morto de Z, liaj heredontoj heredos nur la monaĵajn rajtojn, sed la rajton pri aprobo heredos nur Beaufront, kaj post li R. Lemaire. Tiun vastan monopolon de E, profitegan al Beaufront, neniu konis tiumomente, krom la koncertanoj. — Noto de la red.)

De la komenco de 1902, la prop. paroladoj, kursoj publikaj kaj senpagaj, fondoĵoj de grupoj, multigis mirinde. En Besançon Saint-Loup, honora dekano de la Fakultato de sciencoj fondas grupon. Rektoro Boirac faras paroladojn en Valence kaj Lyon; en Annecy Boucon, en Nice Huet, en Dijon kaj Beaune Méray, en Grenoble Aymonier, ĉiuj fervore laboras. E fariĝas temo tute aktuala. En Lyon P. Regnaud, prof. pri sanskrito kaj kompara gramatiko elektas la demandon pri lingvo int. kiel temon de lia oficiala parolado ĉe la rekomenco de la Universitataj kursoj. Dank' al la agemo de prof. Offret, helpata de Bourlet kaj de la Touring Club, grupo iondiĝas en Lyon, post parolado de Boirac antaŭ mit aŭskultantoj. Prez. fariĝis la fama prof. Lépine; vicprez. Quinson kaj Dor, sekr. Offret, prof. pri mineralogio ĉe la Univ. kaj kasisto Hennequin, prof. en la Fakultato pri literaturo. Justin Godart (pli malfrue ministro por Laboro) publikigis en la »Lyon

Républicain» entuziasman artikolon por E.

Dume, Bourlet paroladas en Paris antaŭ la »Automobile-Club de France«, »Société des Anciens Elèves des Ecoles d'Arts et Métiers«, »Société de Géographie Commerciale«, en Tarbes, en Lille ktp. kaj, konstatante la rimarkindan rezulton de tiu agado, la Komitato de la SFPE, en kunsido de la 26-a de okt. 1902, oficiale komizias la Grupon de Paris por organizi grupojn en provinco. Samjare, la estraro de la nacia societo estas tiel modifata: Cart, vicprez.; (anstataŭ Hamel); Edouard Bréon, sekretario. (anstataŭ René Lemaire). Plie, laŭ propono de Bourlet, Cart estis elektata prez. de la Komisiono por ekzamenoj de Atesto pri Kapableco.

Kuraĝigite de la oficiala komisiado de la SFPE, la EG de Paris praktike organizas la fondon de provincaj grupoj. En ĉiu urbo, kie Bourlet posedas parencon, amikon, ekskolegon de la Normala Lernejo, kunlerninton, kamaradon ktp., li penas fari paroladon pri E kun helpo de la delegito de Touring-Club. Post tiu parolado, oni malfermas kurson, kiu grupigas entuziasmajn lernantojn ĉirkaŭ instruisto, kiu, plej ofte, lernas mem E-n instruante ĝin. La instruado de E estas faciligata per diversaj novaj publikajoj: (L'E en dix leçons de Cart kaj Pagnier; E-aj Prozaĵoj, Dictionnaire E-français de Beaufront). Poste grupo fondiĝas, la grupo de Paris sendas al la nova grupo kolekton de libroj por ĝia biblioteko. Aliflanke la Touring-Club sendas monsumon por la komencaj paŝoj.

En 1902 la grupon de Paris vizitis rusaj samideanoj, generalo Leviskij kaj Seleznjov. Okaze de la vizito de Seleznjov, la grupo organizis unuan prop. vespermanĝon, 15 nov. 1902.

En la ĝenerala kunveno de la grupo de Paris, kiu okazis 30 jan. 1903, oni konstatis oficiale, ke dum la pasinta jaro la grupo de Paris organizis 18 kursojn en Paris, inter kiuj kelkaj havis cent lernantojn. Plie, kun la helpo de la Touring-Club, ĝi fondis 18 provincajn grupojn. Kelkaj el tiuj

grupoj estis speciale prosperaj. En Boulogne-sur-Mer, en la grupo fondita de Ménil kaj Michaux, tiu lasta faris kursojn al tricent personoj. Kaj la grupo de Lyon iniciatis vastan enketon pri la stato de disvastiĝo de E tra la mondo. G. CHAVET.

La jaro 1903 alportis sufiĉe gravan ŝanĝon al la franca movado. Laŭ propono de Bourlet, la SPPE, kiu estis, kvankam franclingva, tamen int. laŭ siaj statutoj kaj rolo, fariĝis propre nacia, kaj nomiĝis de tiam »Societo Franca por Propagando de E.« (SFPE), nomo, kiun ĝi konservis ĝis nun. Tiu ŝanĝo firmigis la socialan pozicion de la societo kaj havigis al ĝi subtenojn, kiujn ĝi ne povis pretendi sub la int. formo: ekz. la 12 nov. 1903 la Ministro pri milito permesis al la oficiroj aŭ soldatoj aniĝi al la SFPE, kaj la 16 dec. 1903 same la Ministro pri Maraferoj. De tiu momento ĝis la Ido-skismo (dec. 1908) la progreso de la E-movado estas regula, kiel montras la sekvantaj ciferoj.

31 dec. 1902 la jarlibro de la SPPE enhavis 1.800 nomojn, el kiuj 380 fremduloj kaj 1.420 francoj. 31 dec. 1903 2.543 membroj; 52 kursoj estis farataj en 33 urboj, de 49 prof. 31 dec. 1904 3.619 membroj kaj 57 grupoj; la sola Pariza Grupo organizis dumvintre 37 kursojn; buĝeto: 15.750 fr. 31 dec. 1905 4.052 membroj kaj 62 grupoj; krome ekzistis 7 filiigitaj kaj 33 sendependaj grupoj (sume: 102); 144 kursoj, el kiuj 43 en Paris, kaj 101 en 71 urboj; buĝeto: 12.345 fr. el kiuj 2.643 fr. por la propagando. 31 dec. 1906 4.170 membroj kaj 81 grupoj; krome 8 filiigitaj kaj ĉ. 31 sendependaj (sume: 123 grupoj); 206 kursoj, el kiuj 63 en Paris kaj 143 en 67 urboj; buĝeto: 12.118 fr. 31 dec. 1907 2.900 membroj, 89 grupoj; krome 11 filiigitaj kaj 80 sendependaj (sume: 180 g.); 242 kursoj, el kiuj 53 en Paris kaj 189 en 68 urboj; 29 regule funkciantaj juĝantaroj por la Atesto pri Lernado; buĝeto: 10.847 fr.

En la supra tabelo oni povas rimarki, ke, dum la nombro de la kursoj kaj grupoj regule kreskis, tiu de la SFPE-anoj vegetis aŭ eĉ malkres-

kis. Tiu fakto devenis de la rivaleco inter la SFPE, estrita de Beaufront kaj la Pariza Grupo, gvidita de Bourlet. La malkonsento inter tiuj du homoj okazis dum 1903, kiam Bourlet ekkonis la drakonan kontrakton inter Z kaj Beaufront; li sukcesis, post longa batalado, nuligi ĝin, kaj pro lia interhelpo Hachette faris senpere pli liberalan kontrakton kun Z, per kiu, inter alie, ĝi devigis sin eldoni en la »Kolekto Aprobita« gramatikojn kaj vortarojn en la 7 ĉefaj eŭropaj lingvoj. Tiun ruinigon de sia hegemonia revo Beaufront neniam pardonis al Z nek al Bourlet, kaj tial li estis kaponta la unuan okazon por aliĝi al reformo, kies iniciatoro li povus ŝajni.

Alia kaŭzo de malforto ĉe la SFPE estis, ke ĝi konsistis nur el individuoj, ne el grupoj; neeviteble estis okazontaj malkonsentoj inter la grupestroj kaj la prez. de la SFPE, kiu havis kun ili nenian statutan rilaton. La situacio, interne de Francujo, estis tiam iel simila al tiu de UEA kontraŭ la naciaj societoj, post la milito. Bourlet klare vidis la sekvindan vojon kaj iniciatis de 1904 agadon por kunigi la grupojn en federaciojn, kaj poste aliĝi la SFPE en grandan federacion; tiu ideo realiĝas iom post iom, okaze de la Ido-skismo, kaj tia estas ja la nuna stato de la SFPE.

Malgraŭ tiuj organizaj malfaciloj, la movado prosperis. 24 feb. 1904 la Franca Asocio por la Progreso de la Sciencoj donis al la Pariza EG sumon de fr. 200 kiel monhelpon por partopreni en la Ekspozicio de Saint-Louis (Kanado); ankaŭ SFPE voĉis 200 fr. Okaze de tiu Ekspozicio, la Pariza EG pretigis fonografajn cilindrojn per la firmo Pathé Frères: monologo de Hamleto, Kanto de Ofelio, La Espero, La Vojo ktp.

7 aŭg. 1904 okazis en Calais (Nordfrancujo) kunveno de ĉ. 120 E-istoj francaj, anglaj, belgaj, ĉefaj kaj germanaj, okaze de kurado de motorboatoj, organizita de la Automobile-Club de F. Tiu kunveno estis la unua, en kiu renkontiĝis multaj alilingvuloj praktike uzante E-n. Oni diskutis pri la akcento, la

ortografio de propraj nomoj kaj la E-a insigno. Laŭ propono de Michaux, la tre agema prez. de la EG de Boulogne-sur-Mer (Bulonjo ĉe Maro), oni ankaŭ decidis, ke »kolektiĝo aŭ kongreso simila okazos en 1905, ĉe Bulonjo«. Ceestis inter la francoj Capé, Deizny, Bastien, Ménil.

Je sept. de 1904 translokiĝis en Paris, kun la alveno de P. de Lengyel, la eld. de Lingvo Internacia, kies redaktadon zorgis, jam de jan. 1902 Fruictier. Ĉirkaŭ tiu duonmonata revuo grupiĝis Cart, Corret, Robert k. a., kaj ili donis al ĝi la specialan karakteron, kiun ĝi konservis ĝis sia malapero: idea malvasteco, »despota« (Z) netoleremo kontraŭ ĉia novaĵo, ĉu lingva, aŭ organiza. Ĝi atakis unue Beaufront, ĉar li enlasis en la verkojn de la »Kolekto Aprobita« neologismojn, ekz. »grimpi« (kies Z-econ tiu ĉi pruvis), kaj post la ekdesperantiĝo de Beaufront, ĝi plubatalis kontraŭ Bourlet kaj la grupo de La Revuo. Ne volante juĝi tiujn polemikojn, oni tamen ne povas ne konstati, ke el la grupo de L. I. eliĝis, krom la Sintakso de Fruictier, neniu valora verko, dum ĝiaj kontraŭuloj multigis la verkojn utilajn kaj gravajn (Gramatiko de Aymonier, Vortaroj de Grosjean-Maupin ktp.), kaj potence helpis al la starigo de la int. organoj (Centra Oficejo, K. K. K.) necesaj por la movado.

Tiu jaro vidis ankaŭ aperi la 1-an n-ron de la Int. Scienca Revuo (ĉefred. Fruictier) kaj fondiĝi la Medicina EG de F. (iniciatoro: dro P. Rodet).

La sekvanta jaro, 1905, estis la jaro de la Unua Oficiala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Mar. Michaux renkontis multajn malfacilojn, ĉar la Parizanoj estus volintaj fari ĝin en Paris, sed dank' al la firma subteno de Z, kiu tre amike rilatis al Michaux, lia projekto prosperis; jam en okt. 1904 aperis komuna alvoko subskribita de Beaufront, prez. de la SFPE, Ballif, prez. de la Touring-Club de France, Bourlet prez. de la Pariza Grupo kaj Michaux, prez. de la Bulonja Grupo. Kuniĝi tiujn kvar nomojn sube de unu alvoko ne estis

tiam la plej facila afero en la preparo de la kongreso. En letero al Michaux, de la 26 nov. 1904 Z mem fiksis la ĝeneralan aspekton de tiu kongreso, kiu estis iĝonta modelo por la sekvantaj: »La kongreso devas efiki sur la sentojn kaj fari impreson, kiel eble pli grandan kaj neforgeseblan impreson. Multe da soleneco, muziko, efektoj por la okuloj ktp.; ju pli ni efikos sur la sentojn, des pli niaj kongresoj kaj sekve ankaŭ nia afero fariĝos popularaj en la mondo.. Ni devas peni, ke niaj kongresoj per sia soleneco kaj ĉarmeco fariĝu korekscita religia centro, kiu allogados ĉiujare la amikojn al int. frateco el la tuta mondo... Eble estus bone aranĝi ian historio-etnografian maskobalon aŭ promenadon, finiĝantan per ia danco de int. frateco?... (Krome) la kongreso devos ellabori fortikan organizadon de nia tuta laboro«. La 25 jul. Z alvenis Parizon, loĝis ĉe Javal kun kiu li de antaŭe havis profesiajn rilatojn, kaj la morgaŭon estis akceptata de Bienvenu-Martin, ministro por la publika instruado, kiu honoris lin per la kruco de la Honora Legio; li alvenas en Bulonjon la 3 aŭg. kaj prezidas la Kongreson, kiu komenciĝas la 5-an. El la 5 vicprez. estis tri francoj Boirac, Sébert kaj Michaux; sed efektive prezidis nur Boirac. Pro la ĉeesto de Bourlet, Beaufront ne venis, deklarante sin malsana. Post la malferma parolado de Z, kiu finiĝis per la »Preĝo sub la verda standardo«, kantis foroj, kaj estis ludata unuakta komedio »Mensogo pro amo«. Sekvantan tagon okazis granda E-a koncerto, dum kiu oni ludis la 1-an grandan komedion tradukitan E-n »Edziĝo kontraŭvola«, de Molière. En la kongresĉambrego estis ekspoziciataj komercaj, literaturaj, propagandaj dokumentoj. Oni faris ekskursojn, interalie Anglujon, al Dover. Enskribitaj estis 688 kongresanoj, el 20 nacioj. Tio estis grandega sukceso, kiu vekis entuziasmon inter la E-istoj kaj eĉ en la laika publiko. Oni de tiam ne plu povis kontesti la eblecon interkompreniĝadi pere de nura E. La Bulonja Kongreso donis viglan antaŭenpuŝon al la propagando kaj forte sentigis

al la ĉeestantoj, ke E estas jam iel vivanta lingvo.

En tiu sama jaro fondiĝis la Presa E-ista Societo, kiu prenis sur sin la eldonadon de L.I., sub la gvidado de Cart; kaj la Societo E-ista por la Paco, sub la gvidado de G. Moch; ekaperis la unuajn-roj de la Espero Pacifista (monata revuo) kaj de Tra La Mondo, ilustrita distra revuo (ĉefred. Capé-Montrosier). La 3 apr. 1906 estis oficiale elmetita antaŭ la Deputitaro »Projekto pri rezolucio, celanta inviti la Registaron al la enkonduko de la Lingvo Int. E en ĉiujn programojn de la Publika Instruado, kiuj enhavas la instruadon pri vivantaj lingvoj«. Tiu projekton redaktis L. Cornet, deputito de Sens, kaj subskribis 11 aliaj deputitoj. Sammomente la »Petit Parisien«, kies eldonkvanto estis tiam »la plej granda en la mondo«, decidis publikigi senpage la komunikajojn de la francaj E-aj grupoj, kaj citis 8 francajn ho'elojn, ĉe kiuj funkcias E-ista interpretisto.

La 1 sept. aperas la unua n-ro de La Revuo, direktata de Bourlet, kaj eldonita de Hachette. »La penso pri fondo de tiu Revuo, skribis poste Bourlet, venis al mi nur, por ke nia Majstro havu okazon regule publikigi siajn modelajn verkojn.« Kaj efektive Z honoris ĝin per konstanta kunlaborado. Tiu iniciaton de Bourlet oni ne povas tro alte taksii: dank' al li Z povis ricevi sufiĉe altan salajron, kiu ebligis al li la tradukadon de multaj klasikaj verkoj (de »Ifigenio« ĝis »Genezo«), kaj li akiris samtempe la rimedon publikigi ilin grandskale. Sen Bourlet kaj lia Revuo, ni ne havus tiun vastan Z-an verkaron, kiu definitive kreis la E-an literaturon kaj fiksis la E-an stilon.

Samjare fondiĝis en Paris Grupo de E-istaj Komercistoj kaj en Reims la unua E-ista konsulejo, ĉe librovendisto Chauvillon.

Ne estas tie ĉi la loko por detale paroli pri la »Delegitaro por alpreno de Lingvo Internacia«, fondita en 1900 de Le au kaj Couturat. Ties historio estas tro longa kaj ankoraŭ malbone konata. Sed oni povas simple diri, ke Couturat, granda filo-

zofo, E-ĝinta, rimarkis en la lingvo erarerojn, kiujn li volis korekti; li manovris lerte por akiri la apogon de la amaso de E-istoj kaj la konfidon de la ĉefoj; ti ŝajnis unue limigi sin je la forigo de la supersignoj, kaj pro tio akiris la aprobon de multaj bonaj E-istoj. Sed iom post iom li rimarkis, ke la strukturo de la lingvo estas tiel kompakta, ke se oni forigas la supersignojn, oni devas ŝanĝi ankaŭ grandan parton de la gramatiko (pro vortetoj kiaj: ŝi, ĝi, ĝi, ĉi ktp.) kaj de la vortaro; post multaj provoj, korespondadoj, diskutoj kun aliaj reformemuloj, li, kun helpo de Beaufront, starigis projekton, kiun ili nomis Ido kaj prezentis al la Komitato de la Deleĝitaro, sidanta en Paris de la 15 al la 24 okt. 1907. Tiu Komitato alprenis »principe E-n, pro ĝia relativa perfekteco kaj pro la multaj kaj diversaj aplikoj jam ricevitaĵ, sub la kondiĉo de kelkaj modifoj farotaj laŭ la raporto de la sekretarioj (Leau kaj Couturat), kaj laŭ la projekto Ido«. La Lingva Komitato rifuzis kunlabori kun la Komitato de la Deleĝitaro, okazis skismo inter la E-istoj, kiu, precipe en F., multe malfruiĝis la propagandon. La francaj E-istoj devis krei al si novan gazeton La Franca E-isto, kies unua n-ro aperis nur en dec. 1908, ĉar »L'E-iste« estis la posedo de Beaufront. Ili devis reorganizi la SFPE, kies aliigon en federacion postulis unuafoje Bourlet la 24 jan. 1909. Tiu aliigo, obstine kontraŭita de Cart, efektiviĝis malgraŭ li, post minaco de skismo, en majo 1911. Tiumomente la SFPE konsistis el 10 federacioj, 143 grupoj kaj preskaŭ 10.000 membroj. Ekzistis 43 lernolibroj en franca lingvo (L'E en dix leçons, de Cart et Pagnier; Manuel d'E, de Chavet et Warnier; L'E à l'École, de Picard; Grammaire Complète, d'Aymonnier; Versions et Thèmes, d'Aymonnier et Grosjean-Maupin; Grammaire et Syntaxe, d'Esselin ktp), 58 verkoj tradukitaj el la franca (Molière: Georgo Dandin, de Z; Renan: Vivo de Jesuo, de E. Gasse; Balzac: Eugenio Grandet, de E. Gasse; Molière: La Avartulo, de S. Meyer; Molière:

Don Juan, de Boirac; Leibnitz: Monadologio, de Boirac; Méri-mée: Carmen, de S. Meyer; Abato Prévost: Manon Lescaut, de Vallienne; Rolandkanto, de Dro Noël; Fragmente: Lafontaine: Fables, de Vaillant; Mistral: Mi-rejo, de Noël; pluraj originalaj romanoj (La kastelo de Prelongo, kaj Ĉu li? de Vallienne), 9 E-aj gazetoj kaj 9 prop. bultenoj aperantaj en Francujo.

G. WARINGHIEN.

Dum la krizo de Ido, multaj grupoj estis ekŝiĝintaj el SFPE, kaj multaj aliaj, ne ekŝiĝintaj, ne pagis plu la kotizon. Granda parto el ili organiziĝis en regionaj Federacioj (la unua estis la Burgonja, 21 jul. 1907), kiuj deziris interligon, sendepende de SFPE. Cart, prez. de SFPE, deziris konservi la nunan formon (Societo de membroj); Bourlet postulis Societon de grupoj, kaj apogis la ideon de federacio de federacioj. SFPE kunvokis delegitojn de la fidelaj grupoj (apr. 1909) por reekzameni la regularon; ĝi kunvokis ankaŭ la prez. de la 6 tiamaj fed., kiuj reprezentis 6000 anojn, kaj kiuj, krom la fed. de Provenco (200 anoj), postulis: forigon de izoluloj, malplikarigon de kotizoj, periodan renovigon de la tuta Komitato, kreon de ĝeneralaj servoj. La kunveno de delegitoj, reprezentantaj 600 anojn, ne akceptis tiun programon. Fine de 1909, 8 fed. ekzistis en preskaŭ tuta F. En jun 1910, tri el ili kreis Unuiĝon de fed. E-istaj de F. (Aiziere, Decourt, Duviard). En 1910 la situacio estis do malfacila kaj malklara. La E-ista movado estis distranĉita en du partojn. Ekzistis: 1, La Nacia Societo SFPE, la plej malnova el la naciaj societoj, sed neresaniĝinta post la krizo; 2, Regionaj Federacioj; 3, sendependaj grupoj; 4, izoluloj.

Du projektoj de reorganizo konkurencis: tiuj de Paris, kaj de Bourges. La principo de la Pariza projekto estis: ĉiu E-isto estu en grupo, ĉiu grupo en federacio, ĉiu fed. en federaciario; ne dezirindaj estas izoluloj kaj sendependaj grupoj. La projekto de Bourges konservis tiujn kategoriojn, favorante tamen la fed. pli ol la grupojn, kaj la grupojn pli ol

la izolulojn; post korektoj ĝin akceptis 6224 voĉoj kontraŭ 425 kaj 1074 nepartoprenantoj.

En 1911 estas do starigita nova Societo, kiu kunigis la Nacian Francan Societon por Propagando de E, kies prez. estis Cart, kaj la unuigon de fed., kiun prez. Aiziere. La nova Societo, kiu konservis la nomon SFPE, entemis fed. kaj izolitajn grupojn; ĝi akceptis ankaŭ bonfarantajn anojn. Cart rezignis la prezidantecon. Rollet de L'Isle fariĝis prez., kaj la prez. de la Komisionoj estis: propagando, Bourlet; instruado, Cart; gazetararo, Archdeacon. La Societo publikis ĝis bultenon.

De 1907 ĝis 1910 la E-a movado en F. enskribis la plej malgajan paĝon de sia historio, plenan de kontraŭpersonaj atakoj, pri kiuj neniu el la partioj estas senkulpa. Iom post iom la spiritoj repaciĝis, sed malrapide, ĉar dum 1911 daŭris disputo inter Cart kaj L. I. unuflanke, Bourlet kaj la Revuo aliflanke. En la fino de 1910 estis aperinta »Dictionnaire complet E-fr.« de Grosjean-Maupin, tre zorge ellaborita, sed kiu enhavis multajn vortojn neoficialajn kaj ofte kritikeblajn. Cart akre atakis tiun verkon, nomante ĝin »malbona ago«. La situacio de Cart, en la movado franca kaj en Akademio, donis al tiu atako specialan fortecon. La aŭtoro kaj Bourlet interŝanĝis kun li longdaŭran malafablan polemikon. En dua eldono la aŭtoro forigis la plej gravan parton de la kritikitaj vortoj. Krom la personaj motivoj, tio estis epizodo de la ĉiama diskuto inter la kelkfoje netoleremaj »fundamentistoj« kaj la kelkfoje malseveraj »neologistoj«. Sed en tiu epoko la diskuto estis aparte akra, pro la freŝdata skismo de Ido, kaj pro la malnova konkurado inter la du grupoj de eminentuloj. Tiu konkurado estingiĝis iom post iom, kaj poste Cart proklamis la servojn, kiujn Grosjean-Maupin faris al E.

En 1913, la gazeto »Franca E-isto« de Menu de Ménéil (fondita 1908) kunfandiĝis kun La Movado de Houbart (fond. 1909), kiu fariĝis la oficiala organo de SFPE. La Franca Federacio de Junaj E-istoj

(Duviard, Pichon, Delage), kiu estis eldoninta la gazeton »Juneco« (1909—1910), reorganiziĝis en 1913, kaj elektis ankaŭ »La Movado« kiel organon.

En 1913 ekzistis 10 federacioj, 161 grupoj aliĝintaj al SFPE (inter kiuj la Pariza grupo kun pli ol 1000 anoj), kaj trideko da aliaj. El enketo de SFPE, al kiu nur 124 grupoj respondis, oni povis kalkuli 371 kursojn, kaj plie 46 en oficialaj instruadejoj; 45 urboj monhelpis la lokajn grupojn. Ekzistis 12 E-aj gazetoj, ne kalkulante bultenojn de grupoj kaj de federacioj.

Oni komencis klopodi pri la deka Universala Kongreso, kiu estis okazonta en Paris la 2 aŭg. 1914. Bourlet, la tre agema prez. de la Pariza Grupo, volis prepari Kongreson tute »sensacian«. Tre bedaŭrinde li mortis la 12 aŭg. 1913. La Komitato (Bricard, Chaussegros, Rollet de L'Isle kaj Warnier, sek.) daŭrigis senlancan preparadon; la Kongreso aperis kiel imponega manifestacio: preskaŭ 4000 E-istoj estis aliĝintaj, kiam eksplodis la milito.

De 1911 ĝis 1914 aperis en F. pluraj vortaroj (Boirac, Plena Vortaro E-E-a kaj E-franca—Chavet et Warnier, Dictionnaire F-E—C. Rousseau, Poliglota Vade-Mecum de Int. Farmacio—kaj Grosjean-Maupin, Dict. F-E, kaj Dict. E-F.) Aperis ankaŭ dudeko da tradukoj (Fénelon, Aventuroj de Telemako, de Vallienne—Baizac, La Vendetta, de Merckens, ktp.).

Dum la milito SFPE sendis al la francaj batalantoj kaj militkaptitoj librojn kaj dokumentojn.

Post la milito la movado estis tute malorganizita, kaj ankaŭ en tiu tempo la laboristaj E-istoj forlasis la neŭtralan movadon kaj formis siajn apartajn grupojn.

Jam en 1919 la estraro de SFPE proponis novan regularon, kaj en 1920 ĝenerala kunveno faris gravajn ŝanĝojn. Ĉar la grupoj estis preskaŭ malaperintaj, kaj nur individuoj oni povis atingi, la Societo decidis, ke ĝi konsistos nur el individuoj, kaj ne plu el aliĝintaj grupoj, sed kun dezi-

ro, ke en ĉiu urbo la E-istoj formu grupojn.

En 1921 du gravaj faktoj estas menciindaj: la deziresprimo subskribita de pli ol 40 membroj de la Scienca Akademio, postulante disvastigon de E (laŭ instigo de Rollet de L'Isle), kaj la komenco de la senlaca propagando de Baudet en la komercaj rondoj.

En 1922 la nombro de la grupoj reorganizitaj ne pliiĝas plu (nur 25); tamen la malnovaj propagandistoj volis konservi la principon de individueco; la novaj, kun Couteaux kaj Dubois, volis aliformigi la Societon en unuigon de grupoj; opiniante ke la propagando estas unue loka kaj regiona, poste nacia, ili atribuis unuarangan rolon al la grupoj, kiuj estus enkadriĝitaj en regionajn federaciojn por gvidi kaj subteni ilin.

La nacia Kongreso de Limoges (1923) aprobis la novajn ideojn kaj voĉdonis tute novan regularon laŭ la proponoj de Couteaux. Rollet de L'Isle, prez., kaj Cart, vicprez., ekzigis, lasante plenan liberecon al la novigantoj. Cart restis prez. de la instruada Komisiono (ĝis 1925). Cart, Rollet de L'Isle kaj Seberty fariĝis Hon. Prez. En 1923 Eyquem estis elektita prez. de la Societo, kaj Couteaux, ĝen. sekr. Iom post iom la regionaj prop. federacioj stariĝas en la tuta lando, kaj la varbado de anoj progresas unue malrapide, sed akceliĝas precipe de 1928.

La 3 jun. 1922 bedaŭrinda bato frapas la francajn E-istojn. Léon Berard, ministro por la publika instruado, aperigas cirkuleron, per kiu li malpermesas, ke la Rektoroj de Akademioj allasu kursojn pri E en la Universitatojn, kaj disponigu lokon en lernejoj al la E-istaj asocioj. La ĉefa kaŭzo de tiu decido ŝajnas esti, ke Sovetio alprenis E-n; tamen en F. la proporcio de laboristaj grupoj estis nur 8%. Cetere Berard ne kondamnis E-n, sed li konsideris ĝin nur kiel skeleto en lingvon por int. komercado; sendube lia opinio ŝanĝiĝis, ĉar poste li pensis, ke ĝi povas helpi al la pliproksimiĝo de la popoloj. Tiu decido alportis gravan malhelpon al niaj grupoj, el kiuj multaj

kunvenis en lernejoj, kaj al la propagando. En sept. 1924, François Albert, posteulo de Berard, decidis, ke la cirkulero estos de nun nuligita, kaj la 19 jun. 1925 li komunikis tiun decidan al la Rektoroj. Jam la 7 nov. 1924 la Pariza grupo rekomencis siajn kunvenojn en la Sorbonne.

En 1925 la registaro akceptas E-n kiel lingvon por telegramoj, kaj tuj poste la Konferenco de la Tutmonda Telegrafa Unuiĝo akceptas ĝin por la int. interrilatoj telegrafaj.

Eyquem mortis la 27 jan. 1926, en la momento kiam li ĉiumaniere klopodis ĉe la registaro, por ke la SFPE estu deklarata »Societo por publika utileco«. Tia deklaro estas tre interesa por societoj en F., ĉar tiuj societoj rajtas posedi kapitalon, ricevi pertestamentajn donacojn, ktp.; ĝi estas nepre necesa por alporti firman financon bazon. Li ne povis sukcesi, ĉar la Ministrejo por Eksterlandaj Aferoj kontraŭstaris.

La 2 apr. 1926 estas elektita prez. Archdeacon. Li denove klopodis ĉe la Ministrejo malfavora, kun helpo de Guadet. Kvankam tiu provo ankoraŭ ne sukcesis, tamen oni povas esperi, ke baldaŭ ni atingos la celon.

En majo 1926, ĉe la Nacia Kongreso en Parizo, oni diskutas pri unueco de la kotizoj por UEA kaj SFPE: unua gesto de SFPE por unueco de la ĝen. movado. Oni decidis ankaŭ ke la franca lingvo kaj E estos la du lingvoj de la Naciaj Kongresoj.

En majo 1928 (Nacia Kongreso en Lyon), unua diskuto pri ŝanĝoj en la int. regularo de E, kaj pri kunfandiĝo de la Naciaj Societoj kaj UEA. Unue oni kritikis precipe, ĉar la sama persono prezidas la Centran Komitaton, UEA kaj KR, kaj ĉar UEA ne publikigas detalajn kontojn. Oni konkludas, ke ankaŭ la int. movado bezonas definitivan regularon, kaj ke la tiama stato (Kontrakto de Helsinki, 1922) povas esti nur provizora, ĉar la kunekzisto de la Naciaj Societoj kaj de UEA malhelpas al la propagando. Unuparte la dueco de kotizoj malfaciligas varbadon de anoj; aliparte la elekto, la kontrolo de la delegitoj, la apogo kiun ili bezonas

por agi efike, estas aferoj plenumeb-laj nur de organizajtoj lokaj, regionaj aŭ naciaj. Dubois, franca repr. en KR, estas komisiita por redakti planan projekton de regularo, kiu tute kunfandus la Societojn kaj UEA. Tiu projekto, zorge ellaborita kaj aprobita preskaŭ unuvoĉe en 4 naciaj Kongresoj (1929, 1930, 1931, 1932), estis la bazo de la reformo adoptita dum la UK en 1932, kiu, post diversaj ŝanĝoj, fariĝis la Interkonsento de Kolonjo, 1933.

En 1930, la gazetoj en Hindoĉino (v.) komencis paroli pri E.

En 1931, la Bulteno de la »Ligo por la Homaj Rajtoj« enketas pri la Lingvo Int. El 77 sekcioj respondintaj, 72 aprobas E-n, organizas parolad-ojn, ktp.

1932 estas grava dato por E en F. La 30 jul. malfermiĝis la XXIV-a UK en Paris, sub la patronado de Lebrun, prez. de la respubliko, kaj de 12 ministroj. Honora prez.: André Baudet; prez.: Warnier, dank'al kiu la kongreso sukcesis (1618 kongresanoj), malgraŭ la ekonomia krizo kaj la apenaŭ kredeblaj malfacilaĵoj kontraŭ eksterlandaj vojaĝoj de personoj kaj de mono en plej granda parto de Eŭropo. La ĉefa rezultato de la Kongreso estis la nuligo de la Kontrakto de Helsinki.

En 1933, Ferez fondas »Les Légi-ons E-istes« (prez. Marya Schmitter), Asocio de individuoj — eĉ ne ankoraŭ parolantaj E-n — por disvas-tigi la lingvon kaj triumfi la ide-alon de paco.

En la nuna tempo, la E-a movado en F. tre kontentige kreskas. Ĝin apogas la plimulto de la publika opinio, kaj ŝajnas, ke baldaŭ ĝi atingos plej kuragiĝajn rezultatojn. Sed, ĉar ĝi estas multaspekta, oni devas mencii aparte ĝiajn ĉefajn partojn.

Konsisto de SFPE.

Jaroj	Federacioj	Grupoj	Anoj
1923	0	12	248
1928	13	45	1569
1933	16	94	3200

Tiu tabelo enhavas la Federaciojn de Nordafriko kaj Indoĉino. Plie SFPE entenas 4 federaciojn specialistajn: Fed. E-ista Universitata de Fr. — Asocio F. de blinduloj-E-istoj.

F. Ligo de la Amikoj de E. (fond 1930, hon. prez. prof. Langevin, prez. Gaudet). — Asocio amika de la E-istoj Policistoj en F. kaj Kolonioj. 8 aliaj grupiĝoj ne aliĝis al SFPE: F. Ligo de Katolikaj E-istoj — Federa-cio E-ista Laborista — E SFIO (soci-alista) — Asocio de F. Poŝtistoj E-istaj — E kaj Commerce — Ra-dio-Club E-iste de F. — La Maison de l'E — Grupiĝo E-ista de la Instru-ado — ne kalkulante la komunistan Asocion.

Libroj. Post la milito la ĉefaj lernolibroj restas la samaj, kaj plej »Cours Pratique d'E« (1925); — Ape-riis »Plena Vortaro de E«, verkita de Grosjean-Maupin, ktp. (1930), kaj kelkaj teknikaj vortaroj. Sed la gra-vaj literaturaj verkoj estas tre mal-multaj: nur du verkoj tradukitaj el la franca: Molière: La Mizantropo, de Boucon, kaj Romains: Knock, de Corret; kaj la origin-alaj verkoj de R. Schwartz: Verdkata Testamento; Prozo Ridet-anta, Anni kaj Montmartre, La stran-ga Butiko.

Librejoj. Antaŭ la milito, la plej grava fr. eldonejo de E-aj libroj estis la mondfama firmo Hachette, dank'al Carlo Bourlet. Alia specialigita el-donejo estis la Presa E-ista Societo, fondita de Lengyel en 1904, kiu prezidis Cart. Ekzistis ankaŭ speci-ala librejo »La Librairie de l'E«. Post la milito Hachette ne interesiĝis plu pri E; la Presa Societo fariĝis nur presejo, kaj la »Librairie de l'E« estis malaperinta.

En 1920, la »Centra Librejo E-ista« aĉetis la plej grandan parton de la ver-koj de tiuj firmoj. Ĝi fariĝis la sola tut-E-a librejo en Francujo (direktoro Dauphin).

Jaroj	Kapitalo	Vendo de libroj
1920	45.000 fr. fr.	22.000 fr. fr.
1924	41.000	73.000
1928	71.000	90.000
1932	86.000	144.000

Instruado. La unua pioniro estis Blanc, lernejestro en Livron (Drôme), kiu jam en 1898 skribis favor-ajn artikolojn en pedagogiaj gazetoj, faris paroladojn ktp. En 1900, prof. Lambert varbis prof. Méray, kaj de tiam eminentaj universitataj aliĝis.

al E (Bouriet, Boirac, ktp.). Iom post iom E penetris en kelkajn liceojn. Ni citu i. a. Evrot, kiu en 1902 gvidis kurson en la liceo de Grenoble, Delygny, kiu en 1904 fondis licean grupon en Saint-Omer, k. a.

En la unuagradaj lernejoj ni citu Robert, kiu gvidis kurson en Pariza lernejo (1905), kaj instruistojn: Vatel, kiu gvidis kurson por instruistoj (Paris, 1905, 30 ĝis 60 instruistoj ĉeestis), Picard, kiu verkis libron (L'E à l'Ecole, 1911) pri la rezultatoj ricevitaj; Aizières kiu organizis »L'E à l'Ecole«, fr. Asocio de E-istaj instruistoj; Durieux, lernejestro en Lille, kiu dum 6 jaroj (ĝis la milito), aprobata de sia Inspektoro, daŭrigis kurson en sia lernejo, kun ekzameno kaj diplomo.

Post la milito, la cirkulero Berard (1922), malhelpis la progresojn. Post ties nuligo (1924) la movado progresis. En 1926—1927 ekzistis kursoj — nedevigaj — en liceoj kaj kolegioj: Strasbourg, Saint-Omer, Annecy, Alger ktp., kaj en porkomercaj kaj teknikaj lernejoj.

La 20 dec. 1925, la Kongreso de la Unuiĝoj de Universitatoj por la Societo de la Nacioj, en Strasbourg, voĉdonis deziron por E.

En la supera instruado, la 1 nov. 1926 fondiĝis en Lyon Franclanda E-ista Univ. Federacio (sekr. Despeyroux) por helpi al disvastigo de E ĉe la Universitatoj (prof. kaj studentoj). Ĝi havas nun Langevin kiel honoran prez., Thiry kiel prez. kaj Guadet kiel ĝen. sekr. Tiu Federacio konsistas el grupoj ĉe la Universitatoj. La unua Kongreso (Toulouse dec. 1927) estis brila sukceso; ĝi ricevis, kiel la sekvantaj, la patronadon de la Ministro por Publika Instruado.

Sed precipe ĉe la unuagradaj instruistoj E sukcesis. Multaj el ili vidis en E ilon efikan por int. paciĝo kaj kontraŭmilita propagando. La plej konata propagandisto estas Ferez. En aŭg. 1932 li atingis belegan sukceson. Du gravaj ĉiujaraj Kongresoj de Ŝtataj Geinstruistoj okazis: unu en Clermont-Ferrand (Nacia Sindikato de Fr. Geinstruistoj, 80.000 anoj), la alia en Beineaux (Unueca Sindikato pri

Laika Instruado); ili reprezentas grandan plimulton de la fr. instruistoj Dank'al Ferez (Clermont-Ferrand) kaj Marly (Bordeaux) ili, kun fortaj motivoj kaj analogaj esprimoj, postulis enkondukon de E en ĉiujn lernejojn, kaj la oficiala organo de la Nacia Sindikato (L'Ecole Libératrice) dediĉas kronikon por E.

En dec. 1931, fondo de la »Groupement E-iste de l'Enseignement Primaire« (sekr. Despeyroux, kiu fariĝas (jan. 1933) la »Groupement E-iste de l'Enseignement« (Despeyroux kaj Ferez), kies organo estas la »Tribune E-iste« de Ferez.

En 1932, pli ol 500 geinstruistoj parolas E-n, kaj kursoj estas malfermataj ĉe Superaj Lernejoj por Instruistoj en Grenoble (Dejean) kaj Nice (Avril).

SFPE faris specialan propagandon ĉe la skoltroj. La 14 sept. 1924, laŭ instigo de Duval, kunveno de reprezentantoj de E kaj de skoltroj adoptis laborplanon. Duval fariĝis delegito de SFPE por propagando ĉe skoltroj. Okazis specialaj kursoj, ĉefe antaŭ la tendado en Gödöllő, 1933; ankaŭ favoraj artikoloj en skoltaj revuoj.

Ekzamenoj kaj diplomoj. La Franca Societo organizis kvar kategoriojn de ekzamenoj kaj de diplomoj. 1, Atesto pri Lernado (elementa). 2, Supera Atesto pri Lernado (komerca kaj teknika). 3, Atesto pri Kapableco, por kandidatoj al profesoreco — ekzistas speciala Atesto pri Kapableco por alilanduloj. 4, Diplomo pri Superaj Studoj E-istaj, por profesoroj ĉe Altaj Lernejoj, fidindaj tradukistoj, ktp. Sed de ĝia kreo (1926) nur unu E-isto akiris ĝin.

Kunvenoj ekstergrupaj. Jam en 1900 SFPE decidis organizi 3 vespermanĝojn en Paris por grupigi la ĉiulandajn E-istojn loĝantajn provizore en la ĉefurbo. La unua (21 jul.) ricevis nur 9 kunmanĝantojn (2 alilandanojn); oni rezignis. Post kelkaj jaroj la Pariza Grupo decidis rekomeni la vespermanĝojn (12 okt. 1904); ili fariĝis preskaŭ ĉiumonataj, la 12-an principe. La plej fama okazis la 1 aŭg. 1905, dum la ĉeesto de Z en Paris (250 personoj). Oni devas ankaŭ citi »La Barço« fondita de Cart

por Atestuloj pri Kapableco. En 1907, oni organizis en Paris vesperkuavenojn teatrajn kaj artistajn, tekunvenojn, promenekursojn. La sekcio de Montmartre organizis teatrajn vesperojn, kiuj baldaŭ (1909) farigis »La E-ista Kabaredo«, prapatro de »Verda Kato«. Antaŭ la milito oni estis organizinta kelkajn tagmanĝojn en diversaj kvartaloj de Paris. En 1924 Camecasse organizis ĉiujarde E-istan tagmanĝon. Sed la 12 dec. 1925 Warnier restarigis la famajn vespermanĝojn de la 12-a, trimonatajn; ili estas precipe prop. kunvenoj: oni invitas ĵurnalistojn, scienculojn, politikulojn, ktp., kiuj renkontiĝas kun 50 ĝis 100 E-istoj. En 1931 Mittey fondis ĉiulundan tagmanĝon (Agapoj); en 1933 alia ĉiumerkrede (Balliman). Plie oni kreis rendezuejojn en Paris kaj provinco; la ĉie konata estas tiu de la kafejo Talma, fondita de Ferrarî (ĉiusabate), en Paris. Sed la plej fama ekstergrupa kunveno estis la »Verda Kato«, E-ista Kabareto en Paris, fondita en dec. 1920 de la E grupo »Amika Rondo«. Ĝi organizis kabaretaĵajn vesperojn en sia »miaejo« ĉe apudbulvarda strato Notre-Dame-de-Bonne-Nouvelle. Ĝi tiris sian nomon el la famega »Nigra Kato«, artisto kabareto kiu floris de 1885 ĝis 1897. La programoj de V. K., inspiritaj de facila Muzo, konsistis el kanzonoj, revuscenoj, burleskajoj, ktp. La ĉefa organizanto estis Raymond Schwartz, kiu forlasis V. K. en 1925, kaj verkis »Verdkata Testamento« en 1926. Lin anstataŭis Paul Echard. Sed fine de 1927, kiam Echard torveturis eksterlanden, la V. K. ĉesis. Ĉefaj partoprenintoj: Le Corneç, Nels, Menu de Ménil, Marchand, Dubois, Aisberg, Grenkamp.

Domo de l' Esperanto. »La Maison de l'E« estas Asocio de Amikoj de E, fondita en 1928, laŭ la iniciato de Archdeacon kaj Warnier, kun la patronado de eminentuloj aŭ gravaj personoj en ĉiuj takoj de scienco, tekniko, komerco, turismo, aviado, ktp. Kotizoj altaj, minimume mil fr. ĉiujare. Generala celo: faciligi la int. rilatojn kaj helpi pli fruktodonan interkonatiĝon, malgraŭ la barilo de la lingvoj; pro-

pagandi E-n en la medioj speciale bezonantaj komunan lingvon. Organizas senpagajn kursojn, subvecias gazetojn kaj diversajn E-ajn organizaĵojn, helpas al la ĝenerala propagando ktp. Ĝen. sekr. estas C. Rousseau.

Radio. 7 apr. 1924, unua E-a disradiado el Paris (PTT). — En 1924: fondo de int. Radio-Asocio; ĝin prez. d-ro Corret, kiu paroladis en diversaj radiorondoĵ. Post raporto de Daniel Berthelot, membro de F. Instituto, la Komitato de la F. Unuiĝo por Radio postulas E-n kiel helpan lingvon de Radio. Eyquem klopodis ĉe Herriot, registarestro, postulante disradiadojn en E. — 12 marto 1925, unua kurso ĉe oficiala stacio (PTT), de Cart, — 19 apr. 1925, la unua Kongreso de Radio-Amatoroj, en Paris, adoptas E-n kiel sian helpan lingvon uzotan apud la naciaj. —

En 1926 tri radiostacioj dissendis kursojn ĉiusemajnajn.

Fondo de Int. Radio-Revuo, ĉefred. Corret, (daŭris unu jaron). En 1927 5 stacioj dissendis E-n (Cart, Corret, Delanoue, Deny, Rousseau). En 1932 13 stacioj (inter kiuj la ĉefaj), dissendis kursojn aŭ sciigojn. En 1933 ĉiusemajne, ĉe la stacio Tour-Eiffel, SFPE disradias raportojn pri la turismaj regionoj en F. Ĉefaj aliaj kursgvidantoj ĉe la diversaj stacioj: Avril, s-ino Borel (Borel staciestro en Lyon), Bourdelon, Curnelle, Dubuisson, Favrel, Gicquel, Pinty, Pouchot, f-ino Rameau, Rivier, Rouquie, C. Rousseau, Sedillot, Trotin.

Asocio »Radio-Club E-iste de France« Fondita (1926) por disvastigi E-n ĉe radioamantoj kaj la francan industrion alilanden. Prez. Mesny, sekr. Favrel, aliaj membroj Archdeacon, Chiron, Corret, Warnier, Arger, Aisberg, Cart, Couteaux, Dubois, Houbart, Selves. Adminstras Favrel kun ges-roj Gaveau. Inaŭguro (20 majo 1927) en la Sorbonne, sub prez. de Lallemand, membro de F. Instituto. Ĉiuj gravaj radio-gazetoj represas la komunikajojn de Radio-Club (ni citu i. a. ĝeneralon Cartier). En 1930 ĝi fondis la revuon Radio-E. Red. Favrel kun Mesny, Archdeacon, Corret, Gaveau. Plie

Favrel organizas la F. Centron pri Informado por Radio kaj E (30 delegitoj en Fr. kaj alilande). La unua kaj dua Naciaj Kongresoj de la »Radio-Clubs«, RCEF aprotigis enkondukon de E kiel lingvon por interkomunikiĝo en Radio. En dec. 1932, ĝi kreis la urĝbultenon SOS, kies abonantoj promesas agi tuj kaj amase, ĉiufoje kiam necesas influu rapide radiostacion. En 1932 kaj 1933, okupis standon en la Foiro de Parizo. Enspezoj: en 1929, 680 fr. fr. — en 1932, 3032 fr. fr.

Nombro de anoj: 1 jan. 1929 45

1932 512 sept. 1933 1095

Ĝi organizis perkorespondan kurson kiu instruis: ĝis marto 1931 170 lernantojn, sept. 1933 670 lernantojn. Tiujn belajn rezultatojn oni dankas precipe al Favrel, animo de RCEF tuj de ĝia fondo. Tiu Asocio aliĝis al SFPE (1929), ekŝiĝis (1932), kaj poste ambaŭ asocioj interkonsentis pri akordiĝo (1933).

Turismo. En okt. kaj dec. 1900, unuaj artikoloj de Lambert kaj Laisant en la grava »Revue du Touring-Club de France«. En apr. 1901, unua kurso farita de Beaufront ĉe la Touring-Club; tuj poste, alia de Carlo Bourlet. En nov. 1901, la sidejo de la Pariza Grupo fiksigas en la Oficejo de Touring-Club (sed la kunvenoj okazas en la Sorbonne). Dum kelkaj jaroj Touring-Club alportis gravan helpon al E, kaj ĝia Revuo varbis multajn E-istojn. Post la milito, la agado ĉe la Sindikatoj de Iniciato akompanas la propagandon ĉe la komercistoj. Iom post iom, tiuj sindikatoj interesigas pri E, pluraj presigas reklamilojn. En febr. 1932, la Unuiĝo de la Federacioj de tiuj Sindikatoj esprimis diversajn dezirojn por enkonduko de E en sindikatojn, hotelojn, ktp; pluraj sekretarioj ĉeestis kursojn. En 1930 kaj 1931, SFPE organizas kun la Itala Federacio Turisma karavanojn al Italujo. En 1931, la urbo Cannes, la unua, starigis indikajn platojn en E sur siaj vojoj (dank'al Cresp); poste la urbo Cagnes-ĉe-maro (Guerrini). En 1932 la fr. fervojaj Societoj, okaze de la XXIV-a Kongreso en Paris, surmetis afiŝojn aŭ indikajn platojn en E en la ĉefaj

limstacioj kaj en Paris; kelkaj konservis ilin depost tiu tempo. En 1932 kaj 1933 la Vojaĝoficejo Globe-Trotter en Paris organizas en sia sidejo kursojn pri E. En 1933 kreo de grupiĝo »E kaj Turismo«, por helpi al turismo en Fr. kaj alilande per E. Iniciatinto: Dupuis. Prez. A. Baudet, sekr. ĝen. Dupuis, kas. Marseille; alta patronado de subministro por turismo Appel; subvencio de la Norda fervoja Societo. Tiu grupiĝo organizis kolektivajn vojaĝojn propagandajn. En 1933, SFPE organizis karavanojn al Köln kaj la bordoj de la Rejno (Petit), kun partopreno de Francoj, Hispanoj, Italoj kaj Katalunoj.

Komercio. La 14 jan. 1899, Canet (stenografisto) gvidis kurson ĉe la »Ecole Pratique de Commerce« en Limoges. En 1904, kreo de Komerca sekcio en la Pariza grupo (Lecaron, Balliman, Peloille); ĝi elektis unu tradukanton en ĉiu departemento, por helpi al la komercistoj: trofrua provo; ĝi ĉesis en 1910. Ĉirkaŭ 1907 kelkaj grandaj magazenoj interesigas je E, havas interpretojn, ktp. Sed neniu vera organizo antaŭ la milito. La 9 febr. 1921, la Pariza Komerca Ĉambro aprobis la raporton de André Baudet, kiu rekomendas disvastigon de E kaj ties enkondukon — nedevigan — en la porkomercajn lernejojn. De tiu tempo, la ĉiama propagando de Baudet iĝis favoraj al E la plimulton de la Komercaj Ĉambroj en Fr., kaj alilande. Kursoj pri E estas farataj en la komercaj lernejoj en Paris, kaj devige en la Lernejo de Supera Instruado por junulinoj. La Komercaj Foiroj (Paris, Lyon, Marseille, ktp.) uzas E-n, havas standojn. En 1931, la Pariza Foiro interŝanĝis 248 leterojn en E kun 26 landoj. En 1923, en Lyon, la Scienca Kongreso por pliampleksigo de la int. komercaj interŝtatoj, aŭdinte Bobin kaj Privat, voĉdonis (unuanime krom unu voĉo) deziresprimon rekomendante uzon de E. En 1923 fondo de »E kaj Komercio«. En majo 1925, en Paris, dua Int. Konferenco por uzo de E en Komercio kaj Industrio; pli ol 400 delegitoj reprezentantaj 10 registarojn, 171 komercajn ĉambrojn, 14

komercajn foirojn, 208 firmojn aŭ privatulojn. 4 feb. 1931, Ĝenerala Kunveno de la Francaj Komercaj Ĉambroj, post kiu pluraj patronadas E-n kaj malfermas kursojn. 2 jun. 1931, kunveno de la prez.-oj de la Fr. Komercaj Ĉambroj rekomendas multigon de kursoj kaj petas, ke oni serĉu rimedojn por faciligi uzon de E en komerc kaj turismo.

Asocio: »E et Commerce« fondita (1923) por helpi al disvastigo de fr. ekonomio (Balliman, Delanoue, Deny, Rousseau, Warnier). La Foiro de Paris kaj la Pariza Komerca Ĉambro estis membroj fondantaj. La prez. estis d-ro Nuyts, poste Grandjean, kaj nun Baudet, kiu donis antaŭenpuŝon. Ĝi verkis vortaron de teknikaj terminoj nun presatan, organizis kunvenojn por perfektigo, perkorespondajn kursojn; kreis bultenon (1928); fondis sekcion por la oficistoj (kunvenoj por interparolado, prunto de libroj); kreis »Société Auxiliaire pour les Applications Commerciales de l'E«. Ni citu ankaŭ: André Petit, Marseille, Dupuis, f-ino Gerard Dusausoy kaj Gueritte.

Sciencoj. Antaŭ la milito, la scienca E-movado naskiĝis en Francujo kaj ankaŭ poste ĝi havis diversajn sukcesojn (aliloke menciitajn). En majo 1925 okazis en Paris Int. Konferenco por uzado de E en sciencoj puraj kaj aplikitaj, organizita de ISAE (Rollet de l'Isle). Plej eminentaj scienculoj kaj teknikistoj patronis. Prez. Cotton. Ĝi studis la rimedojn por enkonduki E-n en la sciencajn kaj teknikajn rondojn; i. a. adoptis metodojn por verki teknikajn vortarojn, kaj komisiis la ISAE por daŭrigi la laboron difinitan. — En 1926 fondo de Bulteno de ISAE kaj de Teknikaj Vortaroj (Rollet de l'Isle, Rousseau). En 1929 fondiĝis la Grupo de la Ekslernantoj de la »Ecole Centrale des Arts et Manufactures« (A. Baudet, Badoit, Courtet, Deny, Dupuis, Marseille). — En 1931, la med. gazeto »Le Phare Médical« malfermis enketon pri E (Cligny), kiu vekis intereson en kuracistaj rondojn. De 1932, tiu gazeto resumas ĉiujn artikolojn en E. (Briquet). — En Meteorologio, ni

citu s-anon ĝenerala' on Delcambre, dir. de la Nacia Meteorologia Oficejo en Paris, kaj reprezentanto de la Ministro por Aviado ĉe SFPE. En 1932, ĉe la Int. Kongreso de Elektristoj, Cotton kaj Mesny apogis Wüster por enkonduko de E en tiun medion. Poste, la oficiala bulteno de la »Société Française des Electriciens« resumas ĉiujn artikolojn en E (Mesny). En 1933, Cotton prezentis E-n en Madrid ĉe Komisiono por Sciencaj Terminoj komisiita de la Int. Instituto por Intelektala Kooperado.

Eminentuloj. En nuna F. preskaŭ neniu kontraŭbatalas E-n. Sed multaj eminentuloj aprobis formale aŭ bonvolis patroni. Jen kelkaj: Membroj de Franca Instituto: Appel, d' Arsonval, Daniel Berthelot, Branly, Broca, Calmette, Charcot, Cotton, generalo Ferrie, Guillet, Lallemand, Lecornu, Lumière, Meillet, Painlevé, Richet, Roux, generalo Sebert. Aliaj scienculoj: Aulard, M. Boulle, generalo Delcambre, Langevin. Membroj de la Medicina Akademio: Broca, Calmette, Pinard; Roux, Sergent, Richet ktp. Industriistoj: Eiffel, Farman, Michelin. Verkistoj: H. Barbusse, Léo Clarelle, Fr. Coprée, d-ro Foveau de Courmelles, Léon Frapié, Romain Rolland, Jules Romains. Komercistoj: Pascalis, André Baudet.

Politikistoj (ministroj aŭ eksministroj): Fr. Albert, Antierou, Bonnefous, Chaumet, Daladier, Dalbiez, Gaston Gerard, Hennessy, Herriot, Honorat, Leygues, de Monzie, Painlevé, Steeg, kaj multaj deputitoj kaj senatanoj. En 1907 deputito Lucien Cornet prezentis projekton, subskribitan de 69 kolegoj, por enkonduko de E (nedevice) en la publikan instruadon. — Nun estas formata grupo por E en la Ĉambro de la Deputitoj. Aliaj: Ferdinand Buisson, Albert Thomas. La plej famajn mi citis, ĉar nur en la Scienca Akademio (unu el la 5 partoj de Franca Instituto), pli ol 40 scienculoj subskribis deziresprimon por E (laŭ instigo de Rollet de l'Isle).

»Komuna lingvo estas la plej efika ilo por homfrateco, la esenca instru-

mento por paco« (Richet) — «Vi helpos por krei en la mondo ĉiun unuecon de direkto, kiun ni, ĉiuj kaj ĉiaj, deziras en nia lando» (Painlevé) — «E estas la plej bela donaco al la homaro» (Prof. Gosset) — «E gardos la naciajn lingvojn kontraŭ la alilingva enpenetro, kiu fuŝas ilin ĉiutage pli.» (Coppée) — «La sukceso de E malebligos la precipecon de fuŝita angla lingvaĉo, kaj helpos samtempe al defendo de la franca, kaj al pureco de la angla.» (Aulard) — Fine Meillet, la fama lingvisto, en sia libro «Les Langues dans l' Europe Nouvelle»: «Vana estus teoria diskuto: E funkcias.»

Dum la 15 unuaj jaroj de intensa propagando en F., sufiĉe multaj verkistoj atakis E-n. Ni citu: Fr. Sarcey, kun kiu polemikis Chavet (v.) André Theuriet, kies opinio tamen ŝanĝiĝis, ĉar poste li permesis la tradukon de siaj verkoj. Remy de Gourmont, kiu severe atakis E-n kaj skribis la antaŭparolon de broŝuro de Ernest Gaubert: «La Sottise Espérantiste» (la E-ista Stulteco), en kiu la aŭtoro opinias, ke jam ekzistas unu tutmonda lingvo, t. e. la franca. Lia frato Jean de Gourmont opinias, ke la tutmonda lingvo estas la latina Sed, krom la lasta, tiuj atakoj okazis antaŭ la milito, kaj nun atakas publike E-n nur kelkaj ĵurnalistoj, kies nomojn ne konservos la estonto.

Propagandistoj, kiuj utile agis por E en regiona propagando, sed ne estas menciitaj en la artikolo mem: Aussenac, ĝen. sekr. de la Nordorienta Fed. F-ino Barret (Valenciennes). Bosc (Le Havre). Botolelaky (Madagascar), aŭtoro de la unua ŝlosilo E-malgaŝa. Bourdelon, senĉesa propagandisto en gazetoj, enkondukis E-n en la Foiron de Marseille. Boyer, prez. de la Provenca Fed., igis favoraj al E dekkvinon da parlamentanoj. Collin (Nancy). Coppet (mortinta), kiu estis longtempe komitatano de la Pariza Grupo. Courtinat (Lyon). F-ino Desmarest (Amiens). Doue (Paris). Ferrain, kiu reorganizis la Burgonjan Fed. post la milito. S-ino Ferran (Tours, paroladistino). Frecot (Nancy, mortis). G. bert (Saint-Etienne). Gassot, sekr. de la Centrorienta Fed. Genermont, lon-

gatempe komitatano de SFPE kaj de UEA. Gicquel, sekr. de la Centra Fed. Gillet (Paris, mortis). Gnonon (Thiers). S-ino Honnorat (Limoges). Houze (Dunkerque), tre agema en la Norda Fed. kaj en radio. Prof. Jacobet (Univ. Grenoble). Jossinet, sekr. de la Parizregiona Fed. Kapitano Leger, reorganizinto kaj prez. de la Normanda Fed. Leŭtenanto Mannevy (Condé), mortpafita en Marokko en 1912. Marly (Bordeaux), komitatano de SFPE de pli ol 20 jaroj. Merckens (mortis en 1911), unu el la unuaj batalantoj por E, verkis kun Cart kaj Berthelot la unuan nacian E-an vortaron, trad. Balzac: la Vendetta, 1911. D-ro North (Strasbourg). Perrin (Calais), aŭtoro de la prop. folioj de G. P. Ploussu (Grenoble). Prochasson; reorganizis la movadon en Francokcidento post la milito, F-ino Rameau (Limoges). R. atefiarison, la unua atestulo pri kapableco en Madagaskar post la milito. F-ino Recoura, prof. ĉe la Univ. Grenoble. Rivier, organizinto kaj ĝen. sekr. de la Nordafrika Fed. Robin, kiu prezidis la Normandan Fed. antaŭ kaj post la milito kaj organizis grupojn. Sergent (Boulogne-sur-Mer), unu el la organizintoj de la 1-a UK en 1905 kaj S-ino Sergent. Solsona, E-ista presejmaŝto kaj eldonisto. Soubranne (Tulle). Thomas (Clermont-Ferrand), Tiard (Paris). Multaj francaj E-istoj estas menciitaj en la fakaj artikoloj, ktp. L. BASTIEN Laboristoj. Sekve de decido favora al E, alprenita de la Int. Kontraŭmilita Kongreso (Amsterdam, 1902), la franca kontraŭmilita sekcio organizis en Paris dum vintro 1902—1903 kelkajn E-kursojn, kiuj liveris al la lab. E-movado la unuajn propagandistojn. En 1905 fondiĝis en Paris sekcio de «Paco-Libereco», celanta propagandi E-n en ĉiuj antaŭenemaj medioj: socialistaj, anarkiistaj, sindikataj kaj kooperaj. Kursoj estis organizitaj ĉe kooperativoj, socialistaj sekcioj kaj populaj universitatoj. Cirkuleroj, kantoj, alvokoj, poŝtkartoj kaj prop. broŝuroj estis eldonitaj. Tiam Berthelot kreis la gazeton Int. Socia Revuo, kiu fariĝis la organo de «Paco-Libereco». Post kelkaj ja-

roj la asocio kuniĝis kun E-ista Laboristaro»; ŝanĝis la titolon je »Liberiga Stelo«; la sidejo estis en Paris. — En 1910 membroj de Socialista Partio fondis ESFIO-n (Franca E Sekcio de la Int. Laboristaro). La sidejo estis en Paris. La grupo celis propagandi E-n en la Socialista Partio. La sekr. estis Senrono. — En 1911, la sindikatanaj E-istoj fondis Sindikatan E-istan Federacion, kies sidejo estis en la Pariza Laborborso. Kunvenoj okazis akurate ĉiulunde kaj estis iom multnombro vizititaj. — En 1912 ekaperis *Le Travailleur E-iste* (La Laborista E-isto), kies prizorganto estis Louis kaj poste Habert. Tiu monata gazeto efike helpis al varbado en la sindikatoj. — Tiam en Paris tre bruis seso da Idistoj, kies agado malhelpis la propagandon. En la gazeto »La Bataille Syndicaliste« okazis polemiko pri la temo »Esperanto-Ido« kiun sekvis kontraŭparolado en la laborborso; la paroladoj, stenografitaj, aperis broŝure. Cio estis aranĝita de la Sind. Fed.

Post la milito mankis kelkaj el la plej agemaj propagandistoj: Aizières, Raimond, Senrono, Souchaix, Blangarin, k. a. Sed novaj adeptoj revigligis la E-an aferon kaj ĝin direktis laŭ klasbatala principo. Grupoj formiĝis en kelkaj urboj. Kursoj kaj kunvenoj estis organizitaj. En aŭg. 1919 E. Adam (Lanti) publikigis franclingvan broŝureton. *Le Travailleur E-iste* reapertis ĉiumonate de aŭg. 1919. La redakcia sekr. estis E. Adam kaj la adm. L. Glodeau. La unuaj numeroj estis redaktataj plejparte en franca lingvo; de marto 1920 ĝi aperis E-lingve (kelkaj numeroj havis suplementon en franca lingvo). Fariĝinte la organo de »Liberiga Stelo«, int. asocio restarigita en 1920, ĝi ĉesis aperi kiam tiu asocio fariĝis SAT. Ĝin anstataŭis *Sennacieca Revuo*. Ĝi helpis la reorganizon de la movado: Restariĝis la Sindikata E Fed. kaj ESFIO. Ankaŭ estis fondita tipografiista grupo, kiu disiĝis iom poste pro skismo en la sindikatoj.

Dum la unua postmilita kongreso de SFPE (Orléans, 1921) kelkaj proletaj E-istoj kunvenis aparte kaj fondis la Federacion de Revoluciemaj

E-istoj franclingvanaj, kiu unuigis laboristan E-movadon en la franclingvaj teritorioj. Ĝi celis propagandi E-n en la revoluciemaj medioj. La sidejo, unue en Orléans (sekr.: L' Héritier), translokiĝis post kelkaj monatoj en Parizon, 23, rue Morère. La ĉefaj tiamaj pioniroj estis: Adam, Banmer, Boubou, Coldefy, Glodeau, Habert, Migny, Raulin, Marcel Roux, kaj aliaj. En 1922 la sidejo translokiĝis al Troyes; R. Cap fariĝis sekr. La Federacio aperigis grandformatan gazeton: *L' E-iste Révolutionnaire*; ĝi havis 4 n-rojn; red. estis Hugot-Raison. En 1923 la asocio ŝanĝis sian titolon je »Fédération E-iste Ouvrière« (FEO, Lab. E-ista Fed.). La sidejo revenis en Parizon (177, rue Bagnolet). Raguier iĝis sekr.; li aperigis 7 n-rojn de nova organo: *L' Antinationaliste*. Ambaŭ gazetoj ĉefe utilis por kontraŭbatali la agadon de kelkaj Idistoj, kiuj dum la periodo 1919—1924 tre malhelpis la varbadon. Dum tiu periodo la Federacio atingis nur ĉ. 300 anojn.

Ĉe la 4-a Kongreso, H. Cachon estis elektita sekr.; li konservis tiun postenon ĝis 1933. Iom post iom, dank' al disciplina agado de ĉiuj Federacianoj, FEO koniĝas en la plej diverstendencaj laboristaj rondoj; la laboristaj gvidantoj pli atentis nian movadon; la varbado al la kursoj plifaciliĝas. De 1924 ĝis 1930, funkciis »Informservo« por la lab. gazetoj; la sekr. estis Chamarre; kaj dum la lasta jaro, L. Kaiser. En 1927 estis decidite presigi bultenon: *Bulletin de la FEO*, aperanta ĉiurimonate, anstataŭ la maŝinskribita bulteno aperinta ne-regule de 1924; ĝi estas sendata senpage al la membroj kaj lernantoj. Ĝin redaktis la sekretario. (Eldonkvanto: 2000 e-roj. En 1929 la bulteno reprenis la titolon: *Le Travailleur E-iste*. Nun (1933) ĝi aperas ĉiudumonate. (Eldonkvanto: 3500—4000 e-roj.); ĝin redaktas A. Pâris, delegito por la propagando.

La konstanta kreskado de FEO estis haltigata de skismoj rezultantaj de neunueca kompreno pri la rolo de la lab. E-movado, de partia fanatikeco, aŭ de persona ambicio. En

1930—31, du agemaj FEO-anoj komunistaj, Boubou kaj Salan, gvidantoj de la grupoj de Orléans kaj Nîmes, starigis opozicion, kiu celis fari de FEO sekcio de la IPE, komunist-tendenca organizo. Venkita ĉe la 11-a Kongreso (1931), la opozicio fondis en 1932 alian Federacion, kies sidejo estas en Nîmes (Gard), kaj la organon Proleta E-isto. Tiu skismo perdis ĉ. 200 membrojn al FEO, kiu en 1931 havis 910 anojn en 40 grupoj.

En 1932 malnova socialista membro, Chamarre (La Rochelle) entreprenis imiti la komunistojn por krei socialistan organizon. Liaj sampartianoj preskaŭ unuanime kontraŭstaris vikle lian agadon kaj nur kelkaj sekvis lin, kiam li ekzigis de FEO. Lia propagando varbis novajn E-istojn kaj li restarigis ESFIO-n, kiu aperigas bultenon: L'E-iste Socialiste. Chamarre estis helpita de prof. Despeyroux, kiu starigis E-Grupon de la Unuagrada Instruistaro.

La disigaj asocioj malamike rilatas al FEO.

Sekcioj: Ekde ĝia starigo FEO havas sekciojn en Belgujo, kiun prizorgas Van Aelst. La sidejo estas: 24, rue de Sévigné, Bruxelles-Anderlecht. La sekcio estis prospera kaj ne suferis pro la komunist skismo, sed en 1932 kelkaj membroj el la regiono de Liège fondis regionan federacion sendependan. La sekcio havas nun 130 membrojn en 7 grupoj.

La svisa sekcio havis nur kelkajn membrojn, ĝis kiam fondiĝis grupo en Genève, kiu estis dividata de la skismo.

Komence de 1933 FEO kalkulis 760 membrojn en 26 grupoj — entenataj la belga kaj svisa sekcioj. — FEO estas ligita kun SAT per la Gotenburga Konvencio; ĝi kunlaboras amike kun tiu asocio, por kiu ĝi varbas. — Perletera kurso, starigita en 1921, konstante funkcias sub gvidado de E. Robert, (por Francujo) kiun helpas bonvolaj instruantoj. Meznombro la kurso ricevas ĉiujare 200 lernantojn el 300 informetoj. La belga kaj svisa sekcioj ankaŭ funkciigas perkorespondan kurson.

La federaciaj kongresoj okazis en

Orléans (1921), Troyes (1922), Saint-Denis (1923), Rouen (1924), Lyon (1925), Paris (1926), Ivry (1927), Bourges (1928), Saint-Etienne (1929), Saint-Denis (1930), Nancy (1931), Bruxelles (1932), Lyon (1933).

En 1921, dank' al monoferoj kaj pruntoj FEO eldonis 203-paĝan lernolibron (Cours Rationnel) de J. Habert, ĉarpentisto, kaj M. Boubou, instruisto, kiuj rezignis siajn aŭtorrajtojn profite al FEO; ĝi estis reeldonata en pluj 20.000 e-roj. Prop. broŝuro (36 p.) estis eldonata en 50.000 e-roj (1921, 26, 32). En 1925 aperis 76-paĝa broŝuro de Lanti en 2000 e-roj; en 1930 reeldonita 2000 e-re. Plie FEO presigis grandan kvanton da diversaj flugfolioj, afiŝoj, k. a. propagandiloj.

Krom la jam cititaj, ni notu la nomojn de Simone Tinland, Paquier (nuna sekr.), A. Ozérée kaj Suzano Gallo (ambaŭ dronis antaŭnelonge akcidente), Devarences, M. Roux, C. Roux, Capoulade, R. Launay, Rival, Valière, k. a.

Noto. Parto pri la antaŭmilita lab. movado pretiĝis laŭ notoj de J. Habert. H. CACHON.

Frankfurt a. M. Urbo en Germanujo; 541.000 loĝantoj. 2-a kongreso de SAT, 12—16 aŭg. 1921; ĉ. 230 partoprenantoj el 12 landoj. Honorprez. Romain Rolland. Pliseverigo de la kondiĉoj pri membreco. — Int. Konferenco por Turismo kaj Reklamo 30 marto—2 apr. 1929. Paroladoj E-lingvaj, la nacilingvaj tradukitaj nur en E. BRUIN.

Franz (franc) Karl, aŭstro-germano, ŝparkasa ĉefoficisto en Wels. Longjara UEA-del.; bona parolanto; multaj kursoj.

Fraŭlino Suzano. Novelo de V. G. Avsejenko, el la rusa trad. M. d'ém. 1914, 64 p. »Agrabla legaĵo, nek valorega nek vulgara romaneto, interesa priskribo de vivo en soleca kolonio.« (G. S., E, 1920, p. 13.)

Fremdvortoj en Esperanto. Aŭtoro: P. Neergaard, 1932, 60 p. Titoloj de la ĉapitroj: la naturo kaj la fonto de la fremdvortoj, starigo de principoj aplikeblaj je elekto de E-formoj de fremdvortoj ktp. Rekomendita de ISAE.

Frenckell, von (frenkel) Karl, finnlandano, konsulo, dipl. ing., bankestro. Nask. 11 apr. 1880 en Helsinko. Prez. de la ES en Dresden, 1909-19. Dum jaroj afergvidanta sekr. de GEA. Ambaŭ societojn li kondukis tre lerte kaj diplomate tra multaj krizoj. Prez. de UK en Helsinko, 1922. Aranginto de int. antaŭkongresoj en Dresden, 1911 kaj 1921. Dumviva membro de UEA. Eldonis: *Dresdenj E Sciigoj*, verkis artikolojn. Lastatempe laboras speciale por Rotary.

Frenkel Roman, ruso, gimnazia dir. en Enisejsk (Siberio). Verkis: *Verdaj Fajreroj* (originalaj poemoj), 1908, 43 p.; tradukis: *Maja Nokto* de Gogol, 1912; kompilis: *Krestomatia* por infanoj, 1911. Kunlaboris je *Tra la Mondo*, *La Revuo*, *La Bela Mondo*, *Danubo*, *Juna E-isto*.

Frey (frej) Rudolf Michael, aŭstriano, kalkulkonsilanto de la magistrato Wien. Nask. 1 febr. 1885 en Wien. Konatiĝis kun E per L. Siedi pro lia E-insigno dum febr. 1919. Fondis: *tramvoja E-unuiĝo* de W., 1922, *A E-ista Pacifista Societo*, 1924, *E Organizo de la Ofichavantoj de W.*, 1925. Faris en 1931 (15 febr.-26 marto) lumbild- kaj filmpropagandvojaĝon »por Aŭstrio« tra Svedlando, Norvegujo kaj Danlando kun subteno de oficialaj instancoj de Aŭstrujo kaj de la nordaj landoj kaj sekve de tio en W. multajn lumbild- kaj filmparoladojn pri la skandinavaĵ landoj kun speciala prop. por E. Iniciatinto de la »E konferenco, Wien, majo 1934«.

Fridöri Henriko, sviso. Mortis 12 apr. 1928. E-isto de 1906. Laboris por E precipe inter instruistoj. Estis prez. de EG en Zürich, ano de la ekzamena komitato kaj LK. Alfaris al E la instrumentodon de G. Egli, 1912 (Orell Füssli). Kunlaboris je »E kaj Svisa Espero«.

Fridrich (fridriĥ) Rudolf, ĉeho, direktoro de gimnazio en Brno. Nask. 1878 en Wien. De 1920 ĝis 1924 li klopodis kunigi E-istojn de malgrandaj nacioj por komune pledi por rajtegalo; artikoloj pri la temo precipe en *Nova Eŭropo* kaj *Pro-*

greso. Tradukis multajn ĉefajn beletristikajojn.

Fried (frid) Alfred Hermann, aŭstro-germano, publicisto. Nask. 1864, mortis 1921 en Wien. Talenta kaj fervora pacifisto; ricevis la Nobel-pacpremion 1911. E-isto, verkis germanlingvan lernolibron, 1903; tria eld. 1905. Kunlaboris al *L' E-isto*.

Friedrich Ellersiek G. m. b. H. Berlin, devenas de la plej malnova E-eldonejo en G. En nov. 1903 fondiĝis la E-Verlag Müller und Borel, kun propra presejo. Posedantoj estis la fratoj Jean kaj Jules Borel (v.). La firmo eldonis la lernolibron de Borel, krome vortarojn de Christaller, Jürgensen kaj Zamenhof, diversajn aliajn verkojn, la kolekton: EBI. En febr. 1904 aperis ĉe la firmo la monata gazeto »*Esperantistische Mitteilungen*« (E-aj Sciigoj) kiu poste estis alinomata *G. E-isto* (v.). En apr. 1909 la firmo fondiĝis propagandejon, nomatan »*Deutsche E Centrale*« (G. E-Centro) kiun gvidis D-ro Linse. Ĝicelis konigi E-n en G. per flugfolioj kaj propagandaj broŝuroj kiujn ĝi eldonis. La plej konata estis la flugfolio »*Die Esperanto-Sprache auf einem Blatte*« (La lingvo E sur unu folio), kiu ankoraŭ nun ekzistas. D-ron Linse anstataŭis F. Ellersiek de 1. nov. 1909. La tuta eldonejo aktive laboris, sed pro la daŭra malsano de Jean Borel kaj la necesa pligrandigo de la presejo, la entrepreno kunfandiĝis kun tiu de Friedrich Ader, ekzistinta de 1909 en Dresden. La nova firmo sub nomo Ader und Borel G. m. b. H. ekfunkciis la 1 aŭg. 1912. En marto 1922 F. Ader ekŝiĝis el la firmo, lin anstataŭis F. Ellersiek, alligante la dumfonditan propran eldonejon. La nomo de la firmo ŝanĝiĝis al Ellersiek und Borel kun sidloko en Berlin.

En tiu tempo apartenis jam al la eldonajoj de la firmo la *Demandaro* de Ladavèze, *Dokumentoj* de Möbusz, kaj la gazeto »*E Praktiko*« aperanta de 1919. De 1927 sola posedanto estas F. Ellersiek kaj la nomo de la firmo prenis la nunan formon.

En apr. 1929. ankaŭ la firmo *Mosse* transdonis al Ellersiek siajn E-eldonaĵojn. La tiel kunigitaj firmoj ĝis nun eldonis ĉ. 100 diversajn volumojn en la vendovaloro de ĉ. 200.— svfr.

Dum la lastaj jaroj la firmo aranĝas ankaŭ karavanojn al la kongresoj.

Friedrich (fridriĥ) Josef, ĉeĥo, fervoja konsilisto en Košice (Kassa). Nask. 13 jan. 1890 en Kromeriz. E-isto depost sia 16-a jaro. Kunfondis ES-n en Olomouc 1911, estis unu el la Moraviaj E-Pioniroj. Dum la mondmilito vivis kiel militkaptito en Bere-zovka (orienta Siberio) kun J. Baghy. Depost 1919 gvidis la E-laboron en Košice (grupfondo en 1922) kaj en orienta Slovakujo. Komitatano de CAE.

Friis Lorenz, dano, instruisto. Nask. 23 jan. 1904 en Sonderborg. Propagandis kaj gvidis kursojn en Broager kaj Aabyhøj. Fondis E klubon en Aabyhøj. Prez. de la ekzamena komitato por Jutlando, red. la lingvan paĝon de *Dana E Gazeto*, dir. de »Isosek« por Danujo. Verkis du E lernolibrojn. En 1930 edziĝis kun Cor Lignian, Amsterdam, kiu post sia edziĝo administras Danan E Librejon. Ĉefkunlaboranto de la *Enciklopedio*.

Fröding Karl Hjalmar, svedo, liganajisto, nun E-instruisto. Nask. 21 majo 1886 en Mullsjodal. Lernis E-n en 1902 en Svedujo. Organizis E klubon en Rockford, Usono, 1904. Diversaj kursoj. Fondis Skandinav E Instituton, poste Amerikan E-Instituton. Eld. kaj red. *Sk. E-iston*, 1916—17 kaj 1922—23, kaj *Sciencia Gazeto*, 1932. Trad. la rakonton de Jack London *La forto de la fortoj*, (1914, 20 p.).

Frollo Marta, rumanino. Mortis kiel monahino. E-isto de 1889, kiam verkis vortareton, la unuan rumanan E-presajon.

Frost Norman Wentworth, usonano, historiisto kaj geografiisto. Nask. 1 dec. 1884 en Cambridge (Massachusetts). E-isto de 1905. Red. de *Amerika E-isto*, 1918—22. Aŭtoro de *Tricent Jaroj de Historio Bostona*; lernolibro, ktp.

Fruictier (frütje) Paul, franco, d-ro med., ĉefredaktoro de du francaj med. gazetoj. Nask. 4 jan. 1879 en Amiens. Lernis E-n en 1900; post ses semajnoj renkontiĝis en Paris kun Sveda kuracisto, d-ro Krikortz, kaj povis interparoli kun li kaj gvidi lin en la

Universala Ekspozicio. Komitatano de la SFPE, malfermis kursojn kaj havis i. a. lernantojn Cart kaj Warnier. Dum multaj jaroj partoprenis en la klopodoj de la fondintoj de la Pariza grupo. En 1902 farigis ĉefred. de *Lingvo Internacia*, kiu presigis Lengyel en Szegszárd (Hungarujo), kaj kun tiu ĉi fondis la Presan E-istan Societon en Paris, 1905; fondis (1904) kaj redaktis ĝis 1906 la *Int. Sciencan Revuon*. En 1906 aperigis kelkajn numerojn de *Int. Medicina Revuo*, redaktita en E kaj en diversaj naciaj lingvoj, por disvastigi E-n inter kuracistoj; sed tiu entrepreno estis antaŭtempa, kaj la gazeto baldaŭ malaperis. Poste li vojaĝis, ricepe en Oriento. — Verkis multajn artikolojn en E; la plimulto aperis en *L. I. subskribitaj*: O. Wood, P. Aliamet, ktp. Liaj plej konataj verkoj estas: *E-a Sintakso*, 1903, unua provo de plena gramatiko en E. *E-a Vortfarado*, 1914. Ambaŭ verkoj estas kunigitaj kaj kompletigitaj antaŭnelonge de Grenkamp-Kornfeld, kun la titolo *Kompleta Gramatiko de E. L. K. de 1905*. L. BASTIEN.

Frühwirth (früvirt) Mátyás, hungaro, parlamentano. Nask. 1889. Kunfondinto de H. Katolika ES. Foje parolis pri E en la parlamento.

Fuchs (fuks) Jenő, hungaro, d-ro, advokato. Nask. en 1878 en Nagydobos. E-isto de 1909, kiam li fondis grupon en Mátészalka kunlabore kun A. Marich. Del. de UEA en M. de 20 jaroj. Estis kunlaboranto de *La Verda Standardo*. Tradukis el la hungara *Elektitaj Poemoj* de Petőfi, 1910, 55 p. Trad. centojn da poemoj, plejmulto en manuskripto, i. a. de Petőfi: Johano, la Bravulo.

Fuchs (fuŝ) Theodor, aŭstro-germano, d-ro, membro de Akademio por Sciencoj en Wien. Mortis en 1925. Bone trad. poemojn de Z germanen, i. a. *La Vojo*.

Fujisaŭa Cikao, japano, antaŭe: membro de Konstanta Sekretariejo de Ligo de Nacioj Genève; prof. de imp. Univ. de Kyusyu (historio moderna de int. politiko). Nun: publicisto, sekr. de studejo de spi-

rita kulturo en J. Ministro por Edukado; laboras por plibonigi kulturajn rilatojn inter J-ujo kaj Ĉinujo. L. K. Direktoro de J. E. Instituto. Honora membro de Hungara E. Societo. Nask. 18 sept. 1893 en Tokyo-si. Fondis JEI kun Ossaka kaj Asai. Penis kun Privat por ke L. de N. faru utilan rezolucion por E. kaj sukcesis. Ĉeestis UK en Hago kaj Praha. Prez. de JE Kongreso en Hukuoka, 1927, Tokyo, 1932. Flua E. oratoro kaj poligloto. Verkis: »J. kaj mondlingvo«, Esperanto, 1922; »Pri historia evoluado de moderna J-ujo, kondukinta al la renovigo de imperiestra reĝimo en 1868«, 1926.

Fundamenta Krestomatio. Kompilata de Z. 1903, 463 p., 10—11-a eld. 1924—27. Enhavo: Ekzercoj; Fabeloj kaj Legendoj; Anekdotoj; Rakontoj; El la Vivo kaj Sciencoj; Artikoloj pri E.; 70 poemoj. »La teksto prezentas artikolojn represitajn el La E-isto 1889—1895 kaj el unuaj verketoj aperintaj inter 1887 kaj 1902.« (BIL, p. 378.) »Ĉiuj artikoloj en la F. K. estas aŭ skribitaj de mi mem, aŭ — se ili estas skribitaj de aliaj personoj — ili estas korektitaj de mi en tia grado, ke la stilo en ili ne deflankiĝu de la stilo, kiun mi mem uzas.« (El la Antaŭparolo de Z.)

Fundamento de Esperanto, eld. de Z. en 1905, konsistas el kvar partoj: 1.) Antaŭparolo, kie la aŭtoro de E. montras la necescon konservi kiel neŝangeblan bazon tiun verkon, absoluta kondiĉo por la unueco de la lingvo, kaj klarigas la kondiĉojn, en kiuj E. povos, sen rompo de tiu unueco, riĉiĝi iom post iom, per la alprenado de novaj vortoj aŭ formoj montriĝintaj necesaj; 2.) Gramatiko (26 p.) prezentita tre koncize en 16 reguloj; 3.) Ekzercaro (55 p.) zorge gradigita, kiu kompletigas la gramatikon kaj montras ĝian aplikon; 4.) Universala Vortaro (96 p.), kiu entenas la 1800 unuajn E-ajn radikojn, kun traduko en kvin lingvoj. En la Deklaracio (v.) akceptita de la 1-a UK en Boulogne-sur-Mer, 1905, la F. estis proklamita netuŝebla bazo de E., en kiu neniu rajtas fari kian ajn ŝanĝon. Jen la tuta teksto de la antaŭparolo de Z. al la F., akcep-

tenda kaj konsiderinda de ĉiuj E-istoj: »Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu planan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, — estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo. Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj planan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj; sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progreso kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progreso estonta. Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! Tiun ĉi tre gravan principon la Esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto.

Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj Esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: 1) La 16-regula Gramatiko; 2) la »Universala Vortaro«; 3) la »Ekzercaro«. Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj deloj li neniam permesis al si (almenaŭ konscie) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj; li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj Esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj

netuŝeblan fundamenton de Esperanto.

Por ke ia regno estu forta kaj glora kaj povu sane disvolviĝadi, estas necese, ke ĉiu regnanto sciu, ke li neniam dependos de la kapricoj de tiu aŭ alia persono, sed devas obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando, kiuj estas egale devigaj por la regantoj kaj regatoj kaj en kiuj neniu havas la rajton fari arbitre laŭ persona bon-trovo ian ŝanĝon aŭ aldonon. Tiel same por ke nia afero bone progresadu, estas necese, ke ĉiu Esperantisto havu la plenan certecon, ke leĝdonanto por li ĉiam estos ne ia persono, sed ia klare difinita verko. Tial, por meti finon al ĉiuj malkomprenejoj kaj disputoj, kaj por ke ĉiu Esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi, la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, kiuj laŭ silenta interkonsento de ĉiuj Esperantistoj jam de longe fariĝis fundamento por Esperanto, kaj li petas, ke la okuloj de ĉiuj Esperantistoj, estu ĉiam turnataj ne al li, sed al tiu ĉi libro. Ĝis la tempo, kiam ia por ĉiuj aŭtoritata kaj nedisputebla institucio decidis alie, ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj, ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenas al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem. Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro »Fundamento de Esperanto«, devas esti rigardataj kiel oficialaj; ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas ktp., estas nur verkoj privataj, kiujn la Esperantistoj — se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero — povas rigardi kiel modela, sed ne kiel deviga.

Havante la karakteron de fundamento, la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj. Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto) tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la »Univer-

sala Vortaro«. Mi permesis al minur korekti la preserarojn; sed se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe; ĉar se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo, kiu povus kaŭzi disputojn kaj kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata. La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj. La erareco en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ĉar, komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovas la veran sencan de ĉiu vorto; sed senkompare pli grandan danĝeron prezentus la ŝanĝado de la traduko de ia vorto, ĉar, perdirte la severan netuŝeblecon, la verko perdus sian eksterordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco, kaj, trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, kaj li perdus sian konfidon kaj apogon. Al ĉiu, kiu montros al mi ian nebonan esprimon en la Fundamenta libro, mi respondos trankvile: »jes, ĝi estas eraro, sed ĝi devas resti netuŝebla, ĉar ĝi apartenas al la fundamenta dokumento, en kiu neniu havas la rajton fari ian ŝanĝon.«

La »Fundamento de Esperanto« tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto. Ho, ne! Kiu volas perfektigi en Esperanto, al tiu mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, multe pli bonajn kaj pli vastajn, kiuj estas eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj por ĉiu nacio aparte kaj el kiuj la plej gravaj estas eldonitaj tre bone kaj zorgeme, sub mia persona kontrolo kaj kunhelpo. Sed la »Fundamento de Esperanto« devas troviĝi en la manoj de ĉiu bona Esperantisto kiel konstanta gvida dokumento, por ke li bone ellernu kaj per ofta enrigardado konstante memorigadu al si, kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla, por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, kiuj devas troviĝi en ĉiuj lernoverkoj de Esperanto, de la vor-

toj kaj reguloj rekomendataj private, kiuj eble ne al ĉiuj Esperantistoj estas konataj aŭ eble ne de ĉiuj estas aprobatataj. La »Fundamento de Esperanto« devas troviĝi en la manoj de ĉiu Esperantisto kiel konstanta kontrolilo, kiu gardos lin de deflankigado de la vojo de unueco.

Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos... Ho, ne! Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉigadi, sed eĉ konstante plibonigadi kaj perfektigadi; la netuŝebleco de la fundamento nur garantias al ni konstante, ke tiu perfektigado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga rompado kaj ŝanĝado, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera. Pli detale mi parolos pri tio ĉi en la Bulonja kongreso; nun mi diros pri tio ĉi nur kelkajn vortojn, por ke mia opinio ne ŝajnu tro paradoksa.

1) Riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun, per konsiligado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo, kaj zorgante pri tio, ke ĉiuj uzu tiujn vortojn en la sama formo; sed tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj; oni devas ilin uzadi nur en la literaturo; sed en korespondado kun personoj nek onataj estas bone ĉiam peni uzadi nur vortojn el la »Fundamento« ĉar nur pri tiaj vortoj ni povas esti certaj, ke nia adresato ilin nepre trovos en sia vortaro. Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron oficialan, kiel »Al donon al la Fundamento«.

2) Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi re-

komendos uzadi paralele kun la formo malnova. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo. Sed, prezentante parton de la fundamento, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, kaj tiamaniere ni havos la certecon, ke eĉ ĉe la plej granda perfektigado la unueco de Esperanto neniam estos rompata kaj neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj.

Mi montris en principo, kiamaniere la severa netuŝebleco de la »Fundamento« gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo, ne malhelpante tamen al la lingvo ne sole riĉigadi, sed eĉ konstante perfektigadi. Sed en la praktiko ni (pro kaŭzoj jam multajn fojojn preparolitaj) devas kompreneble esti tre singardaj kun ĉia »perfektigado« de la lingvo: a) ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazoj de efektiva neceseco; b) fari tion ĉi (post matura prijuĝado) povas ne apartaj personoj, sed nur ia centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta Esperantistaro.

Mi finas do per la jenaj vortoj:

1. pro la unueco de nia afero ĉiu bona Esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la fundamenton de nia lingvo;

2. la fundamento de nia lingvo devas resti por ĉiam netuŝebla;

3. ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidos pligrandigi (neniam ŝanĝi!) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ĉio bona, kio ne troviĝas en la »Fundamento de Esperanto«, devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata.

La ideoj, kiujn mi supre esprimis pri la Fundamento de Esperanto, prezentas dume nur mian privatatan opinion. Leĝan sankcion ili ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso

de Esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita. — Varsovio, julio 1905.»

L. ZAMENHOF.

Fundamentoj de la Kvakerismo. De Stephen, el la angla trad. Butler. 1916, XV kaj 154 p. Historio kaj principoj de la Societo de Amikoj (v.). Bona traduko.

Fundamentoj de Leninismo. De Stalin, el la rusa trad. 1931, 122 p. Multnombraj citaĵoj el verkoj de Lenin. Formo iom seka, lingvo korekta. (G. S., 'E', 1932, p: 40.)

Funken Leo, germano, asekura re-

prezentisto. Nask. 21 jan. 1903 en Koblenz-Lützel. Ano de progresemaj movadoj, precipe vivreformaj. E-isto de 1911. Prez. de la grupo en Koblenz. Gvidis multajn kursojn, ankaŭ laŭ rektaj metodoj kaj per leteroj. Efektivigis unuafoje »Verdan Libertemp-on« en 1925 en Bad Ems. Kunlaboranto de E gazetoj.

Furmanik Adam Gabriel, polo, mariavita pastro... Nask. 20 dec. 1870. Lia senlaca persistemo favorigis al E la M-an eklezion, kiu eldonas diversajn broŝurojn pri tiu ĉi eklezio. Del. de UEA dek jarojn.



Gabert (gaber) Eugène, franco, kaskisto de la urbo St. Etienne; nun emeritulo. Nask. 28 marto 1869 en S. E. Ano-fondinto de la EG de S. E., estis kas., vicprez. kaj prez. de tiu grupo. Eksprez. de la federacio FER; komitatano de SFPE. Del. de UEA de la kreo, 1908, eksĉefdel., dumviva ano, honora ano kaj patrono de UEA.

Gabrielo, antaŭe Kiperman, Mikaelo, ruso, episkopo ortodoksa en Ĉuguev. Nask. en 1891. E-isto de 1909. Sekr. de la EG en Kiev, 1910—14, konsulo de UEA kaj organizinto de la II-a Tutruslanda E-Kongreso, 1913. En 1912 li faris per-E-an vojaĝon tra Germanujo, Francujo, Hispanujo, Italujo kaj Aŭstrujo.

Gajaj Vesperoj. Verkis kaj kompilis C. Walter. 1931, 80 p. Spritaĵoj, anekdotoj, humoraĵoj, reguloj por gvidantoj, program-konsiloj por grupkunvenoj kaj ludoj — por fari la grupvesperojn allogaj kaj interesaj.

Gaja Knabo. Rakonto de Björnson, el la norvega trad. Liv. Sandberg kaj Dordi Johansen. 1934, 94 p. Karakteriza rakonto pri la vivo en nordo.

Gaja Lernolibro. De C. Walter. 1933, 118 p. »Ĝi estas nur E-a kaj speciale aranĝita por meminstruigo; ĝi uzas rektan metodon, celas distri kaj paroligi la lernanton, tial konsistas, sur unu kolono, el 128 amuzaj bildetoj kun demandoj kaj sur dua, el vortoj kaj respondoj.« (G. S., 'E', 1933, p. 181.)

Galambos (-s) I. o. aka, hungario, E-instr. Logis en Kispest. Ekde 1932 gvidas kursojn en urboj de Danujo laŭ Cseh-metodo.

Gale (gejl) Walter A., anglo, kolonelo. Nask. 9 nov. 1855, mortis 20

dec. 1924. En la brita armeo 1875—1911 (21 jarojn en Hindujo). E-istiĝis en 1907. Multa literatura laboro sub plumnomo Uoago. Citinda estas lia Konkordanco al Sentencoj de Salomono kaj manuskripta Konkordanco al Marta (ĉe BEA).

Galerio de Zamenhofoj. Kolektitaĵ de E. Wiesenfeld. 1925, 40 p. kaj 19 fotoj. »La reciprokaj influoj ĉe P' familianoj estas tiom grandaj, ke por plene kompreni iun ajn el ili, estas utile ekkonni la tutan familion.« (El la Enkonduko.)

Gallois (galúa) Albert grafo, franco. Nask. 20 okt. 1853 en Bayeux. Soifo al neatenditaj aventuroj logis lin for de la hejmo en malproksimajn vojaĝojn, i. a. al Tunisio, Kanado kaj Gvineo, kie li en 1900—01 partoprenis fervojkonstruon kiel dir. E-isto de 1902 kaj de tiam multe laboris por E en Italujo (edziĝinte al italino). En Riolutato li fondis EG-n; kunfond. de ISPE kaj de la gazeto L' E-ista, 1902. Trad. du lernilojn de Cart (1903—04) kaj la Fund. de E al la itala. (Laŭ Giambene la tradukintoj de la lasta: Junck kaj G. ne konis la lingvon italan; l. BIL, p. 269.)

Garbuŭt William Henry, anglo, jurnalisto. Nask. 15 okt. 1855 en Worcester. Unua sekr. de la Birminghama EK; unua prez. de Mezlanda EF. UEA-del. multajn jarojn en Birmingham.

Garzón Ruiz Jozefo, hispano, advokato. Nask. 6 apr. 1871 en San Fernando. Malnova E-isto, fondis Gazeton Andaluzian kaj Gazeton Hispanan. Gvidis kursojn. Verkis hispanlingvajn lernolibro-

ojn kaj E-e: La ŭleĝa Situacio de fremduloj en Hispanujo kaj Kritika ekzameno de la proceso kontraŭ Kristo.

Gasperini Karl, aŭstro-germano, komercministeria oficisto pens. en Wien. Nask. 10 nov. 1872 en St. Gotthard (Hung.) Laboris en katolikaj rondoj.

Gasse (gas) Emile, franco, asekuraganto. Nask. 26 okt. 1881 en Paris. Kunfondis la Popolan Universitaton en Le Havre. E-igis en marto 1900 (la unua en Normandujo). Gvidis multajn kursojn, el kiuj unu (deviga) en la Komerca Supera Lernejo. Verkis: Kurso Tutmonda de E, 1905. Trad. Renan: Vivo de Jesuo, 1907. Balzac: Eugenio Grandet, 1909.

Gaston Emilio, hispano, advokato. Fond. de EG en Zaragoza. Entreprenisto de la ekskurso de la aŭstriaĵ infanoj en Hispanujon post la milito pere de E.

Gautherot (gotro) Gustave, franco, senatano, prof. ĉe la Katolika Instituto en Paris. Nask. 29 marto 1880 en Pierrefontaine (apud Besançon). Tre konata historiisto; libroj precipe pri la franca revolucio kaj la nuntempa komunismo. Interesiĝis pri E antaŭ la milito, en la katolikaj rondoj. Verkis: La question de la langue int. 1919, riĉe dokumentita. Verkis ankaŭ prop. broŝurojn, el kiuj havis gravan sukceson ĉe la katolikoj: Pourquoi nous sommes E-istes, 1910.

Gavrijski Dimitr, bulgaro, d-ro, publicisto kaj oratoro. Nask. en 1879 en v. Gradište, Sevlievsko, loĝas en Sofia. Verkis kaj eldonis broŝuron bulgare: »E venkos la mondon« kaj paroladis pri E. Enkondukis E-n en sia komerca gimnazio.

Gazetaro. Estis granda feliĉokazo por E, ke tuj post la apero de la unua libro de E preskaŭ ĉiuj anoj de la Volapŭka klubo de Nürnberg transiris al E kaj la UEA-Jarlibro de 1927 diras tute prave: »ke la historio de nia movado estus alia, se la du germanaj pioniroj (Einstein kaj Trompeter) ne apogus ĝin siatempe, kiam ĝia forto dependis de P'agado de izolaj sindone-muloj.« Tiuj vortoj precipe rilatas al la eldono de la unua E-a gazeto La E-isto, kiu nur povis esti daŭrigata

en 1893 per la mon- kaj tempoferoj de W. H. Trompeter. Tiun sindonemon oni trovis dum la unuaj jaroj en diversaj landoj, ofte en landoj, en kiuj oni en supozus intereson por mondlingvo kaj en kiuj ofte tiu intereso ne revenis.

Estis plej ofte idealistoj kaj filantropoj, kiuj dediĉis sian tempon kaj monon por la afero. Unu el tiuj homoj estis M. S. Bogdanov, prezidanto de la Klubo E-ista en Sofia, kiu jam en dec. 1889 eldonis la duan E-an gazeton La Mondlingvisto en bulgara kaj E-a lingvoj, formato 15×11 cm. La unua n-ro havis 54 p.; krom bulgara artikolo pri E kaj Volapŭk kaj gramatiko de E ĝi enhavis la »Patro Nia«, parton el la Biblio kaj diversajn poeziaĵojn (precipe de Heine); la dua n-ro kun 10 p. aperis ankaŭ en dec. 1889 kaj la tria kaj lasta kun 32 p. en jan. 1890. En junio 1891 Bogdanov daŭrigis la gazeton sub la titolo La Espero, kiel jaro 2 n-ro 4 kun 8 p. 36×25. Pluaj n-roj ŝajne ne aperis.

Kiam fine en junio 1895 ankaŭ La E-isto malaperis, la E-istoj estis sen ligilo. Felice troviĝis denove idealistoj, kiuj komencis en dec. 1895 la eldonon de Lingvo Int., kiel daŭrigon de La E-isto. Ĉirkaŭ ĉi tiu tempo (jan. 1896—dec. 1897) aperis en Hannover Linguist en germana, franca, angla, volapŭka kaj E-a lingvoj, kiu vane provis kunigi ĉiujn amikojn de la mondlingva ideo. Je la fino de la 19-a jarcento aperis ankoraŭ La E-iste kaj Sciigo de l'estraro de la klubo E-ista de Stockholm (aŭt. apr. 1898—apr. 1900).

Kvankam ankoraŭ ĉiam afero de idealistoj, E tamen eniris kun la komenco de la 20-a jarcento en la stacion de pli praktika laboro kaj progreso, kiu trovis sian plej altan kaj samtempe haltigon en la Pariza Kongreso 1914. La unua gazeto en la nova jarcento estis El E, kiu aperis tute portugallingve (majo 1901) en Valparaiso (sola n-ro). Ĝin sekvis tute en la norda parto de Ameriko en Montreal L'E-iste Canada en franca, angla kaj E-a lingvoj, aŭg.—dec. 1901, 5 n-roj kun 40 p. 28×20. Jan. 1902—jan.-febr. 1904 ĝi aperis en formato 32×24 kun

multaj bildoj sub la titolo: *L a L u m o*. Red. Holmes, Beauchemin kaj Leymarie, entute 412 p. *La Rondiranto* (Bulgarujo) enkondukis periodon de rapida sekvo de apero de E-aj gazetoj, ne nur propagandaj, sed ankaŭ de fakaj, religiaj ktj.

Eŭropo.

Portugalujo. La unua gazeto *Portugala Revuo* aperis en Porto, marto 1909, 8 p. 29×19; ĝi malaperis en la sama jaro, por reaperi de jan. 1913 ĝis komenco de la milito, IV+12 p. 21×14. Red. I. A. Provenca. Kiel en aliaj landoj, ankaŭ en P. kreskis post la milito la laborista, la klasbatala movado. Do estis tute nature, ke post la milito komence aperis en Lisboa gazeto kiel: *Laboro* (majo 1920, 8 p. 23×17); *Socialista* (1920); *Komunist-Eisto* (julio 1921, 4 p. 32×22); *La Vero* de anarhista grupo (jan. 1922, 4 p. 23×16); *La Okcidentulo* (dec. 1931, 32×24). Kiel burĝaj gazetoj aperis nur en 1919 *La Informador E-isto* (31×22) kaj en jan. 1926 *Portugal-E* (IV+12 p. 26×18).

En **Hispanujo** oni sentas jam de la komenco la rivalecon de la diversaj popoloj, precipe de la hispanoj kaj katalunoj, kaj ĝis hodiaŭ oni ne sukcesis unuigi la tutan landon en unu unuigo aŭ gazeto. En la unuaj tempoj la movado estis en la manoj de la hispana partio, kaj la unua gazeto estis 'E', *Revista Mensual Ibero-Americana*. Red. Andrés Bravo del Barrio en Santander marto—okt. 1902—laŭ BIL 1903—16 p. 22×16. La dua gazeto estis *La Suno Hispana*. Dum kelka tempo la urbo Murcia estis — per la vigla propagando de Codorniu — la centro de la hisp. movado kaj la gazeto Murcia enhavis dec. 1905—nov. 1906 kelkpaĝan rubrikon »El E-ista Espanol« (*La Hispana E-isto*) 32×22. Sed ankaŭ jam dum ĉi tiu tempo oni provis de la kataluna flanko, eldoni prop. gazeton *Espero* de Katalunujo (Céret 8 p. 25×16 en E-a, kataluna, hispana kaj franca lingvoj jan.—apr. 1905), sciencaj kaj artan gazeton *Stelo Kataluna* (jan.—junio 1908 IV+16 p. 28×19), sed ambaŭ baldaŭ malaperis kaj nur restis la en jan. 1908 ekaperinta prop., lit. kaj ilustrita gazeto *Tutmonda Espero*. Kiam la E-istoj elektis Barcelo-

non kiel urbon por la V-a UK en 1909, la katalunanoj kun sia forta nacismo kaptis la okazon, por konatigi sian situacion en la cetera mondo. Oni eldonis en aprilo 1909 gazeton *Kataluna Nacio*, *Int. Revuo Kataluna* (8 p. 28×21), kiu de la 2-a n-ro (majo) alprenis la nomon *Supren!*, *Int. Revuo Naciista*, 8 p. 28×22 kaj en sept. — dum la kongreso — 4 p. 44×32. Samtempe aperis en Barcelono du aŭt. gazetoj: en apr. 1909 *Bulteno de Paco kaj Amo* (8 p. 22×16) kaj en junio en 1919 *La Informador E-isto* (31×22) Dum la kongreso aperis ankorau 4-paĝa folio *E* (44×32). Sed ankaŭ la kataluna gazetaro dum tiu tempo multe favoris E-n: la arta kaj scienca gazeto *Fides* akceptis E-n kiel daŭran rubrikon kaj gazeto kiel *La Pulicidad*, *Joventut*, *Orbi k. a. havis* dum la kongreso longajn rubrikojn pri kaj en E. Nur post la kongreso fondiĝis la kataluna landa federacio kaj kun ĝi en jan. 1910 la vera kataluna organo *Kataluna E-isto*, kiu aperas ankoraŭ hodiaŭ. De junio 1912—14 ĝi havis kiel aldonon: *Bulteno de Barcelona Stelo*. Sekvis en Katalunujo ankoraŭ ĉ. 30 gazetoj kun efemera vivo.

Oni povas konstati, ke la katalunoj kreis sian propran E-an movadon, kiu estis pli celkonscia kaj pli forta, ol tiuj el la aliaj hispanaj partoj. En la hispana parto formas la ruĝan fadenon la 4 gazetoj *La Suno Hispana*, *Hispana E-isto*, *Hispana E* kaj *Hispana E-Gazeto*, kies evoluo estas priskribata sub *La Suno Hispana*. Krom ili flanke aperis: *Gazeto Andaluzia* (jan.-dec. 1910). Ĉar intertempe *La Suno Hispana* interrompis la aperon, ĝi farigis en jan. 1911 oficiala organo de HSPÉ kaj samtempe alprenis la titolon *Gazeto Hispana*. Je tiu tempo ankaŭ komenciĝis la aktiva agado de *Mangada Rosenörn* per la eldonado de *Homaro*. Unika gazeto aperis: *La Mondo Karcera* en la malliberejo de Oviedo (nov. 1911. 4 p. 31×23). Plue, aperis 9 diversaj gazetoj.

En la vaska regiono aperis: *Gastotablo*, *Bilbao* (junio—julio 1908 3 n-roj 4 p. 32×22 aŭt.) poste *Bilbao E-isto* (julio 1908, 1 n-ro 4 p. 32×22); *Nova Sento* (julio 1909—febr. 1911).

Kelkfoje oni ankaŭ provis krei tuti-

berian (hispan., portugala-, katalun-, vaska-) movadon, aranĝante iberiajn E-ajn kongresojn. Je la 2-a oni eldonis febr.—julio 1924, „Boletín de la 2-a Congreso de E-istas Ibericos” (Bilbao IV+16 p. 25×17); nova provo okazis en 1931 per Iberia E-ista Revuo Barcelono jan.—? 1931, IV+32—46 p. 24×17).

Francujo havis la feliĉon, kiu trafis — krom Saksujo — neniu alian landon, ke troviĝis unuflanke idealistoj neŝancelante estante samtempe praktikuloj, kiuj disponis pri multege da libera tempo kaj aliflanke ankaŭ pri bonfaruloj, kiuj subtenis la aferon per konsiderindaj monsumoj. Du el tiuj homoj estis la markizo de Beaufront, kiu eldonis L' E-iste kaj la advokato A. Michaux en Boulogne-sur-Mer, la fama aranĝinto de la 1-a UK, kiu eldonis La Revue de l' E (okt. 1903—dec. 1905 aldono al Le Cicerone kaj febr.—julio 1906 memstara, 1-4 p. 32×25). Sekvas generalo Sébert kaj prof. Bourlet, pli praktikaj propagandistoj, la unu en sciencaj, la alia en pli popularaj rondoj. Ili reorganizis la grupon E-istan en Parizo kun pli ol 30 subgrupoj kaj starigis por ili la monatan gazeton Paris-E (okt. 1906—dec. 1910, 8—18 p. 21×14; jan. 1911—julio 1914, 4 p. 56×38; ? 1924—nov. 1925, 4 p. 36×23 aŭt.; jan. 1926—hodiaŭ 8 p. 24×16). Ankaŭ ne-E-aj gazetoj estis instigitaj, akcepti E-n, ekz.: Bulletin de l' Union des Sténographes et des E-istes Gapençais; E-a Revuo aldono al l' Union Sportive en Saint-Omer (dec. 1905—?, 2 p. 33×25); Le Phare Sténographique; Espero Katolika, aldono al gazeto L' Aube (dec. 1902—?); Le Journal du Creusot, Revue locale... et E-iste (jan. 1908—? 4 p. 58×41) k. a. Ĉar intertempe la grupoj pli fortiĝis kaj eĉ federacioj fondiĝis, komenciĝis nun la granda aro de grupoj kaj federaciaj bultenoj kaj gazetoj. Ĉar en julio 1908 L' E-iste ĉesis esti oficiala organo de la francaj E-istoj, Barono F. de Ménéil kreis en jan. 1909 novan organon: Franca E-isto. Poste fondiĝis La Movado (julio 1910—julio 1914, kaj okt. 1923—1933), kiu per kunigo kun Franca E-isto kaj Bulletin Officiel de SFPE en jan. 1913 fariĝis oficiala organo de tiu societo.

Krom la jam nomi aj aperis en F. pli ol 80 E-istaj gazetoj kaj bultenoj, la plej multaj vivis nur kelkajn jarojn aŭ monatojn. El la pli novaj eldonadoj estas menciinda La Tribune E-iste, Strasburgo (de 1930, nuna formato 59×46 cm., 4).

Anglujo. Pri la komenco de la angla gazetaro oni legu sub The E-ist. Ĝi estis la unua E-a gazeto en A. La, dua estis The British E-ist, kiu ankoraŭ hodiaŭ aperas. Sekvas du aŭt. grupbultenoj, eldonitaj de la fama kaj vigla artistino f-ino Oxenford en Hove: La E-a Studento (IV+20—24 p.) kaj La Jurnaleto de la Brighton kaj Hove E-ista Klubo. Sekvas La E-Instruisto, La Kursa Revuo (de Norda Politeknika Lernejo), The Press Quarterley, The E-Monthly, La Naturisto, Bulletin of The Friends E Society kaj pli ol 60 bultenoj de federacioj kaj grupoj preskaŭ ĉiuj aŭt. Notinda estas ankoraŭ Sub la Verda Stelo, aldono al angla sportgazeto Callender Athletic & Social Club.

Nederlando. En la ĉefaj gazetoj de N. oni ĉiam retrovas la nomon de Drevés Uitterdijk, la pioniro de E en tiu lando kaj ĝis hodiaŭ la firma kolono, kvankam ŝajnas, ke li jam de multaj jaroj ne plu konsentas pri la agado de la nunaj gvidantoj (en 1926 li eĉ fondis konkurencon Nederl. E-asociacion). La unua gazeto kiun li eldonis, estis La Holanda Pioniro. Sekvas propagandaj gazetoj: E-Bulletin, Weekblad E, Nederland-E, Semereto, Wereldtaal, ĉar oni de komenco tre favoris la propagandon kaj pro tio en N. estas iomete tio, kion oni povas nomi: E-movado. La neŭtrala E-Societo »La Estonto estas nia« havis kiel oficialan organon ĝis 1921 La Holanda Pioniro kaj de jan. 1932 ĝis hodiaŭ Nederlanda E-isto-n. Intertempe aperis nur kiel »organoj de la nederlanda E-movado« Holanda E-isto, Holanda Pioniro kaj kelkaj grupgazetoj (Utreĥta, Dordreĥta E-isto ktp.). Rimarkinda estas la laborista movado kun Fratenco, Laborista E-sito, Arbeider E-ist, Interembra Informio, Nederlanda Laborista E-isto kaj deko da grupgazetoj. Trian komplekson formas la religiaj gazetoj kun Nederlanda Katoliko, kiu aperas de jan. 1910 ĝis hodiaŭ,

Mededelingen en 1922 kaj Kristana Gazeto.

Belguloj. La Belga Sonorilo, tre konata kaj bona gazeto, fariĝis en 1906 oficiala organo de BLE, sed, ĉar ĝi transiris en aŭg. 1908 al Ido, oni fondis en nov. 1908 Belga E-isto, kiu aperas ankoraŭ hodiaŭ. Post la milito la flandroj kreis propran movadon kun Flandra E-sito. Diversaj grupoj (Gent, Liege, Antverpeno, Ougrèe, Kortrijk k. a.) fondis proprajn, plej ofte nur aŭt. bultenojn. Belga Katoliko komencante en junio 1911 ĉesis je la militkomenco. Propra laborista movado komencis viglan laboron nur post la milito kun Belga E-Proleto (franca kaj E eld.), Servo E (franca kaj E eld.) kaj PEK.

Svisuloj. Neniu gazeto travivis tiel ŝanĝantan vojon kiel la organo de SES Svisa Espero. En apr. 1910 d-ro Uhlmann provis eldoni semajnan dulingvan (germ.-E) aldonon Vespera Horo al germ. gazeto Schweizer Heim, sed post la 26-a n-ro li ĉesigis la eldonon. Proprajn aŭt. bultenojn eld. la grupoj en Zürich (ŝercajn), Ĝenevo, St. Gallen, Bern. La fervojistoj eld. La Svisa Fervojisto poste Cirkulero. Mallongan vivon havis Svisa Revuo Komunista.

Italuloj. La unua E-organizo en I. eldonis jam de 1902—04 L' E-ista. Ĝin sekvis en 1905 Gefratato E-sita, 1905—06 Cirkulero, 1906—07 Idealo, organoj de Sicilia Fed. E-a kaj 1908—9 Notizie E-iste, eld. Junula Amikaro E-ista de Palermo. En marto 1910 estis fondata la ankoraŭ hodiaŭ ekzistanta IEF, kiu tuj eldonis propran bultenon: Atti della Fed. E-ista Ital., kvankam la Palermaj samideanoj ofertis Itala E-isto, kiu komencis aperi en jul.—aŭg. 1910. En 1911 fondiĝis en Ĝenova konkurenca IEA kaj ĝi akceptis I. E. kiel ofic. org., ĝis fine la italaj E-istoj kuniĝis en la federacio kun I. E. kiel organo. En sept. 1919—okt. 1920 I. E. akceptis la titolon E Itala Revuo, nov. 1920—aŭg. 1921 denove nomata I. E. Ĝi eniris en sept. en L'E (kiu jam aperis jan. 1913—aŭg. 1917) kaj de 1920 kiel org. de la en 1912 fondita Itala Katedro de E. En jan. 1923—dec. 1927 L'E estis nomata Itala E-Revuo, jan. 1928—dec. 1929 denove L'E kaj jan. 1930—dec. 1931 Revista L'aŭ-

ana di E, por adepti denove en jan. 1932 la malnovan ti'olon L'E kun taggazeta formato (en 1932—50×35 kaj de 1933—52×37). Ankaŭ diversaj federacioj kaj grupoj eldonis periodaĵojn (Roma, Fiorenino, Mliano, Firenze, Venezia, Torineza k. a.). Unikaj estis: La Militista Biblioŝilo, aldono al la itala militista gazeto Il Biblioŝilo Militare; Corriere Balcanico-E-ista, org. of. de la Accademia Balcanica de Bari; Ladina Patrujo por la konservo de la ladinlandaj lingvoj kaj moroj. Menciindaj estas ankoraŭ: L' araldo E-ista kaj Katolika Sento.

Germanuloj. Pli ol en aliaj landoj oni povas en G. konstati, ke la ekzisto de gaze'o dependas pli multe de la persisto, obstino, energio kaj laborforto de unu aŭ du personoj ol de la monrimedoj. Ni vidas Borel-Ellersiek en Berlin, Schramm—Lederer—Dietterle en Saksujo, Stark en Magdeburg ktp. Ĉar la E-isto en la tri unuaj n-roj sept.—dec. 1889 enhavis ankaŭ germ. tekstojn, oni devas rigardi ĝin unua germ. gazeto. Sekvis Der Deutsche E-ist (aldono al Revuo Int. eld. de Ĉeĵka en Bohemujo); Munfena E-isto kaj jam en 1904 E-istische Mitteilungen, la antaŭiranto de Germana E-isto, kiu fariĝis en jan. 1907 la of. org. de la en 1906 fondita GES (de 1909: GEA), kaj restis ĝis hodiaŭ. Aro da aliaj E-istoj fondis en 1907 kontraŭ-organizon Verband deutscher E-isten en Leipzig kun la organo Saksa E-isto poste La E-isto (kun la aldonoj: Poŝta E-isto, Polica E-isto kaj la Kolektanta E-isto) poste La E-ano (kun iom ŝanĝita E). La arango de UK en G. kaj la sukceso de ĝi estis la kaŭzo por la apero de novaj gazetoj. La plej valoraj el ili estis: Germana E-gazeto (jan. 1908—dec. 1910 dusemajne, de jan. 1911—dec. 1912 semajne) kun diversaj aldonoj, Be'la Mondo, poste Universo, Rund um die Welt. Proks. 40 estas la nombro de laboristaj gaze'oj, ĉu socialistaj, komunistaj, klasbatalaj ktp. La unua estas Der Arbeiter E-ist (aŭg. 1910—julio 1911) poste Antauen (junio 1911—julio 1914) dum la milito Zirkul'ar ansta'aŭ Antauen (febr. 1915 okt. 1918) poste denove Antauen (majo—dec. 1919), poste Der Deutsche Ar-

beiter E-ist (jan.—dec. 1920), poste Der Arbeiter E-ist (jan. 1921—dec. 1927), poste Arbeiter E-ist (jan. 1928—? 1933). Plue aperis proks. 40 ligaj kaj grupaj periodaĵoj — preskaŭ senescepte aŭt.—kiuj ĉiuj aperis post la milito. Proks. 50 ofte bele presitaj bultenoj aperis de burĝaj ligoj kaj grupoj, sed plej multe antaŭ la milito, el kiu fakto oni jam vidas, ke la burĝa movado endormiĝis (kion oni ja ankaŭ povas konstati en la politiko kaj aliaj kampoj de la homa vivo) kaj la laborista per la politika revolucio, la plibonigo de la ekonomia situacio kaj la klasbatala forto multege plivigliĝis. Laŭ la emo de la germanoj estis eldonataj multaj gazetoj de profesioj, fakoj ktp. nome de fervojistoj, poŝtistoj, policistoj kaj instruistoj, studentoj, abstinentuloj, junuloj, katolikoj, kristanoj ktp. Rimarkindaj estas ankoraŭ: E-Propagando (parkurbo E en München) la gazetoj por klarigo de la situacio dum la milito (La Eŭropa milito, Int. Bulteno nov. 1914 — jan. 1919), German-Pola E-isto (por interkonsento inter germanoj kaj poloj), La akra okulo (por okulkuracado).

En Svedujo komenciĝis la disvastigo de E en la plej fruaj tempoj, kaj jam en 1895 oni eldonis Lingvo Int. De jan. 1906 ĝis ĝia Ido-igo en okt. 1908 E-isten estis la of. org. de la landa ligo. Dum 1909—10 Dana E-isto publikigis la sciigojn de la svedaj E-istoj, ĝis ili en Marto 1910 ricevis novan org. Sveda E-isto. De febr. 1913 anstataŭis ĝin La Espero, kiu aperas ankoraŭ hodiaŭ sud la titolo Svenska E-Tidningen. La Espero. Plue aperis E-Folket (jan. 1911—1913). Fyr-väpplingen (jan. 1913—hodiaŭ), Svensk Arbetar E-isten, Sommar, Medlems Blad poste E (la org. de la Malmö laboristaro) kaj kelkaj klubaj kaj laboristaj gazetoj.

En Danujo aperis la unua gazeto kaj of. org. de la landa ligo E Bladet Hjelpe Lingvo en jan.—dec. 1907 kaj de tiam ĝis marto 1912 fariĝis Dana E-isto. Sekvis de julio 1912 Danlando, de dec. 1913 E-Raport, de jan. 1926 La Forta Voko, kiu de jan. 1928 fariĝis rubriko en Sind & Samfund kaj de sept. 1928 Dansk E-Blad. Krom tiuj of. gazetoj aperis ankoraŭ la jenaj bo-

naj: Trompeten, poste: La Mevo kaj La Torĉo.

En Islando aperis (sed nur 1 n-ro) Islanda E-isto.

En Norvegujo la unua gazeto portis la nomon Norvega E-Gazeto (jan.—dec. 1909. En jan. 1910—junio 1914 kaj jan. 1922—1924 ĝi estis nomata Norvega E-isto kaj fariĝis of. org. de la NEL de ĝia fondo en 1911. En jan. 1932 NE reaperis sub la nomo E-bladet kaj daŭrigas ankoraŭ hodiaŭ. Plue aperis: Arbeider E-isten de jan. 1924, La Proleto kaj La Nova Stelo.

Rusujo povis nur malfrue saluti propran E-an gazeton. La ĉefa kaŭzo estis la politika situacio, ja ankaŭ La E-isto el Nürnberg malaperis pro la rusa cenzuro. En 1904 d-ro Ostrovski, kiu estis veninta en 1903 el Jalta al Peterburgo, akiris de la registaro la permeson, eldoni gazeton en rusa kaj E-a lingvoj. La n-ro 1—2 aperis en jan. 1905 kaj la n-roj 3—4 kaj 5—6, kiuj estis la lastaj, en febr. 1905 (ĉiu n-ro IV+24 p. 26×19). Jam en apr. 1905 la Societo «Espero» reprenis la eldonon sub la nomo Ruslanda E-isto kaj kun la sama formato, nur de jan. 1908 ĝi havis tagjurnalan formaton 53×35. En marto 1908 RE ĉesis, ĉar jam en febr. Bitner en Peterburgo komencis eldoni en E kaj rusa lingvoj kiel of. org. de unu el la grandaj rusaj klerigaj kaj kulturaj asocioj Vjestnik Znanija belan kaj riĉenhavan gazeton Espero, kiu estas la plej valora gazeto E-a el ĉiuj ĝis hodiaŭ aperintaj, aperis entute 9 kajeroj (12 n-roj) kun 500 p. multilustritaj. Sed pro la malmultaj abonantoj oni en dec. 1908 likvidis la E-an parton. En marto 1909 A. Postnikov komencis eldoni denove (sed tute sendepende de la unua kaj tute private) Ruslanda E-isto-n (25×17); ĝi ĉesis 1909 pro la en febr. 1909 okazinta apero de La Ondo de E, kiu fariĝis la centra org. de la rusaj E-istoj. Jam en tiu tempo oni povas rimarki la ĵaluzon inter la Peterburgaj kaj Moskvaj E-istoj. Sed spite ĉiuj atakoj La Ondo restis la gvidanta org. kaj ĝi plene meritistion. Flanke de ĝi aperis multaj E-gazetoj, ĉefe nur kun teritoria signifo. Kiam en apr.—majo 1917 La Ondo ĉesis aperi, la E-a vivo preskaŭ tute

endormis. Oni rimarkas nur kelkajn lokajn, plej ofte aŭt. gazetojn. En marto 1917 komencis aperi en Peterburgo aŭt. gazeto Feĉo, kiu fariĝis la elirpunkto de gravaj cirkonstancoj por la E-a movado en R. Ĉi tiu gazeto enhavis de marto 1918 aldonon Monata Poŝto, en kiu la societo »Espero« publikigis siajn informojn sub la titolo Informilo, kaj ĉi tiu estis la antaŭiranto de la Cirkuleraj Informoj, eldonitaj de »Espero« de febr. 1919 (unue aŭt. 2 p. 35×26; poste presite 6—10 p. 27×18) sub la redaktoreco de E. Drezén, kiu estonte gajnis la plej grandan influon je la E-movado en R., kaj kiu ankoraŭ hodiaŭ estas la »forta viro« en ĝi. En 1919 li devis ankoraŭ unufoje iri al eksterlando, sed tio povis nur iomete haltigi lian agadon. La Cirkuleraj Informoj alprenis en junio 1920 la titolon Espero.

Intertempe komencis ankaŭ labori la junuloj. Iliajn vojon signas: Juna Civitano, Bulteno de Moskva Ligo de Junaj E-istoj, La Juna Mondo.

La penoj por krei unuigitan E-an movadon en R. estis tre komplikaj. Fondiĝis diversaj organizaĵoj (Organiza Komitato de Tutruslanda E-Federacio (Oktef), poste: Tutruslanda E-federacio (TEF); Universala E-ligo; Tutruslanda E-ista Komunista Unuiĝo k. a.), sed neniu havis sufiĉan forton por solvi la organizaĵan problemon. Dum tiuj tempoj oni trovas en ĉiuj rusaj gazetoj diskutojn pri la eldono de Revolucia Espero kiel unuiga organo de la rusa movado, kaj la Espero en Peterburgo, kiel jam ofte, oferis sian helpon, promesante eldoni ĝin je propra risko. Sed ankaŭ en tiu grava momento la ĵaluzo inter Moskvo kaj Peterburgo estis tro granda kaj la projekto ne realigis. Je tiu momento — meze 1920 — E. Drezén revenis el eksterlando. Kune kun V. N. Devjatnin li kunvokis en junio 1921 al Peterburgo konferencon de la sovetaj E-istoj, kie oni kunigis ĉiujn E-ajn fortojn en la »Sovetlanda E-ista Unuiĝo«. La prezidantecon de la »Centra Komitato« (CK SEU) oni donis al E. Drezén. De tiu tempo komenciĝis energia kaj ankaŭ efika laboro, eĉ per rimedoj ne ĉiam tute konvenaj. Ke ĉe multaj personoj ekzistis la bezono je laboro kaj ke mankis nur

la instigo, montras la granda amaso de E-aj gazetoj, — pli ol 100 — kiuj komencis aperi dum ĉi tiu tempo — plej ofte tamen nur tre modeste aŭt. kaj nur dum tre mallonga tempo — ŝajnas ili kelkfoje nur eldonitaj, por esti sendataj kiel rarajo al eksterlando por eluzi dum la inflacia tempo la pli valorajn devizojn.

Ne nur propagandaj gazetoj aperis, sed ankaŭ mondopiniaj, beletristikaj ktp. La unuan de tiaj eldonis S. Szabuniewicz en Moskvo, la ĉefdelegito de UEA por R. Ĝi estis nomata Teristo kaj aperis en rusa kaj E-a eldono. Sekvis La Nova Epoko, kiu en okt. 1924 estis kunigata kun Sennacieca Revuo, por reaperi memstare sub sia unua titolo: La Nova Epoko en okt. 1929—julio—aŭg. 1931 kaj de apr. 1932 ĝis komenco 1933, kiam ĝi denove akceptis la titolon Sennacieca Revuo, Nova Serio. Tiuj gazetoj ĉiuj estis eldonitaj de SAT. Sed ĉar intertempe la rusoj sub la gvidado de Drezén malinterkonsentis kun SAT, ankaŭ ili volis havi similan gazeton kaj fondis kun simila nomo La Nova Etapo.

Kompreneble oni en R. provis kontraŭbatali la religiojn ankaŭ per E. Unue oni havis ateistan angulon en Bulteno. Sed en 1929 la Militantaj Ateistoj jam eldonis aŭt. Informa Letero kaj en jan.—dec. 1931 E-an aldonon al rusa gazeto Militanta Ateisto, kiu en jan. 1932 akceptis la titolon Antireligiulo.

La plej multaj gazetoj havis mallongan vivon kaj ofte estis interrompataj. Gazeto, kiu kiel ruĝa fadeno trairas la rusan E-movadon, estis of. org. de CK SEU, sed eĉ ĝi multe ŝanĝiĝis. Kiam Drezén prenis sur sin la prezidantecon, li en majo 1922 komencis eldoni por la organizo kaj kiel ligilon por la aliĝintaj grupoj, izolitulaj, Bulteno de la CK de SEU, plejparte skribita en rusa lingvo. En julio kaj aŭg. 1924 ĝi aperis grandformate. Elirante el la organiza stato al tiu de propagando, ĝi alprenis en dec. 1924—aŭg.-sept. 1925 la titolon Soveta E-isto kaj en okt. 1925—sept. 1926 tiun de Int. Lingvo. En okt. 1926 oni dupartigis ĝin nome: 1) Bulteno de Sovetlanda E-ista Unio (poste de Sovetrespublikara E-ista Unio, poste de Centra Komitato

ta'o de SEU). En sept. 1933 ĝi estis kunfanda' a kun Internaciisto sub la nova titolo Sur Posteno. — 2) Informilo de CK SEU, kiu en jan. 1929 denove ricevis la titolon Int. Lingvo kaj aperas sub tiu titolo ankoraŭ hodiaŭ.

Dum la lastaj jaroj la granda ondo de E-aj gazetoj ebleniĝis kaj ni preskaŭ nur trovas ankoraŭ la gazetojn eldonitajn de la SEU.

Finlando ricevis sian unuan gazeton kaj asocian org. Finna E-isto en apr. 1907. Ĝi ĉesis en aŭg. 1914. De junio 1918 oni donis al finna gazeto Kodin Lethy E-an aldonon E-a Finlando, kiu en jan. 1920—majo 1923 estis memstara. De apr. 1925 aperas kiel of. org. E-Uutiset. Intertempe aperis privata gazeto Movado.

Estlando havis antaŭ la milito kiel fundamenton la »Revela E-ista Grupo«, kiu eldonis en julio—dec. 1907 aŭt. Eldonaĵo, en jan. 1908 Estlanda E-isto kaj de dec. 1913 Estona Stelo. Je la fondo de la landa asocio en 1922 oni fondis Estonia E-ista Revuo-n, kiu de nov. 1923 akceptis la titolon Informoj, kaj aperas ankoraŭ hodiaŭ. Por prolet-E-istoj aperas de majo 1932 Onto.

Litovujo. Litova Stelo apr. 1922—sept. 1926; Litova E-Revuo junio 1929—?

Latvujo. Ondo de Daŭgava apr. 1925—hodiaŭ; Proleta E-isto de dec. 1931—febr. 1933.

Polujo. La unua pola gazeto, kiu restis la of. org. de la Pola E-Asocio de ĝia fondo (1907) ĝis hodiaŭ estas Pola E-isto. En julio 1906—dec. 1907 ĝi aperis en Lwów, de jan. 1908 en Varsovio kaj de jan. 1927 en Krakovo. Diversaj grupaj kaj aliaj bultenoj — plej multe aŭt. — ne atingis signifon (Bydgoszcz, Varsovia kaj Ledza junularo, Krakovo, Piotzkow, Pola E-Servo, Tutmonda Unio de Kolektantoj en Pollando, Radio-Servo, diversaj presservoj ktp.). Rimarkindaj estas ankoraŭ: Lunda Kuriero (dum la 8-a UK), La Novaj Vojoj, Juna Samideano kaj de okt. 1933 E Dla Wszystkich kaj la diversaj periodaĵoj de la Mariavita sekto.

Aŭstrujo. Antaŭ la fondo de la »Ligo« la E-a Klubo Wien eld. en marto 1907—apr. 1908 Klubaj Raport-

oj. Post ĝia fondo, la ligo daŭrigis KR kiel Informaj Raportoj ĝis dec. 1909; ĝi havis de apr. 1909 verdan prop. kovrilon E, kiu en jan.—apr. 1910 nomiĝis Aŭstria E-isto kaj de majo 1910 German—Aŭstria E-isto. En jan. 1911 IR ŝanĝis la titolon en tiun de la lasta kovrilo: GAE kaj ĉesis per la milito en julio 1914. Ĝia daŭrigo estis en okt. 1919—febr. 1922 Nova Tempo kaj en 1922—23 Aŭstria E-Raporto, por prepari, ĉar la ligo disfalis per la milito, novan organizon, kiu en 1923 fondiĝis: Aŭstria E-Delegitaro; ĝi siaflanke kreis Aŭstria E-isto (je propra risko de H. Steiner), kiu aperas ankoraŭ hodiaŭ.

Precipe viglaj estis en Aŭ. ĉiam la E-Societo por Stirio kaj la Ligo de Germ. E-societoj en Bohemujo (poste: Ĉeĥoslovaka Respubliko), kiuj eld. kelkfoje ligosciigojn kaj presservojn por la gazetaro, plue la katolikoj, kiuj ne nur fondis en Graz la »Internacio Katolika« kun Katolika Mondo, sed ankaŭ Blanka Kruco kaj Akle poste Informoj, plue kelkaj grupoj kiel ekz. »Danubio« (Monataj Raportoj) kaj la Vienaj grupoj (Informoj poste Informaj Raportoj). Fine ankoraŭ la laboristoj per La Socialisto, Socialista E-Servo, Sciigfolio (Stirio), Ciumonata Sciigfolio (Wien-Neustadt) kaj du bonaj ŝercgazetoj: La Verda Rano (Linz), kiu estas tute ne konata, bedaŭrinde, ĉar ĝiaj genie kaj kun humoro reprezentitaj homranoj ĉiam denove kaŭzas gajecon, se oni ilin vidas, kaj La Mokemulo (Berndorf). Rimarkindaj estas ankoraŭ: La Innsbrucka E-isto kaj 3 prop.-gazetoj: E-ujo, Die Weltsprache kaj Die Sprache für alle.

Ĉeĥoslovakujo. La unua gazeto estis Ĉesky E-ista, kiu en nov. 1902—marto 1903 estis aldone al Revuo Int. kaj ĝis sept. 1904 memstara; en okt. 1908—dec. 1912 ĝi reaperis kiel of. org. de la en 1908 fondita »Bohema Asocio E-ista«. En 1907 estis ankaŭ fondata la »Centra Asocio Bohema Unio E-ista«, kiu eld. kiel of. org. Casopis ĉeskych E-istu en jan. 1907—aŭg. 1914. Post la milito oni fondis unuigitan ĈAE, kiu kelkfoje havis kiel of. org. La Progreso (marto 1908—hodiaŭ), kelkfoje eld. propran Bulteno de ĈAE. La laboristoj eld-

onis la tre valoran lab. gazeton Kulturo (jan. 1912—junio 1914) kaj kelkajn ne gravajn. Propran grupgazeton havas nur la grupo en Brno kaj la nordbohemiaj E-istoj. Rimarkindaj estas ankoraŭ: Ĉeĥoslovaka Gazeo kun la aldono Nova Eŭropo, E-ista, Sved, E-sky Zpravodaj, Bulteno de Ĉeĥosl. Preso E-a, Ligilo (Prostejöv) kaj Senhalte.

Hungarujo. Grava gazeto estis La Verda Standardo. Ĝi evoluis jene: E (nov. 1904), Hungara E (jan.—apr. 1905), E (majo 1905—marto 1907) kaj poste LVSt. Kiam en 1908 LVSt ĉesis esti of. org. de HES, tiu societo eldonis de majo 1908—junio 1909 aŭt. folie-ton Sciiganto, kiu en marto 1909 estis anstataŭata per Hungara E-isto. Sed, kiam HE devis pro ekonomiaj kaŭzoj ĉesi en 1911, oni estis devigata denove elekti LVSt kiel of. org. Ĝi restis tiu ĝis la ĉeso en dec. 1915, sed kun mallonga interrompo, kiu kaŭzis multan ĉagrenon kaj disputojn kaj dum kiu HES eldonis en Eger Magyar E-uj-ság kaj aŭt. Of. Raportoj de HES. Post la milito reaperis kiel of. org. Hungara E-isto de julio 1918—febr. 1926. Provizore aperis en 1926 Hungarlanda Informilo (of. org.) kaj fine en jan. 1928 la societo ricevis novan org. Hungara Heroldo, kiu aperas ankoraŭ hodiaŭ. Aperis ankoraŭ ĉ. 10 aliaj gazetoj. La laborista HESL havis de jan.—julio 1923 Antaŭen kaj poste fakon en granda kultura gazeto Munkaskultura, kiu akceptis de apr. 1925 E-an subtitolon. Kiam M. pro ekonomiaj kaŭzoj devis en 1928 malaperi, oni reprenis la eldonon de Antaŭen (sed aŭt.). Plue du laboristaj grupoj eld. Bultenojn.

Jugoslavujo. En Kroatujo aperis antaŭ la milito Kroata E-isto, La Zemuna E-isto kaj La Zenuma Stelo kaj en Serbujo Serba E-isto. Post la milito d-ro Maruzzi provis per la Provo, ĉu J. estas matura por E-movado; ĉar li sukcesis, li daŭrigis la eldonon sub la nomo Konkordo ĝis 1929. Plue aperis: Komenco, Sudslava Poŝto, Monda Kuriero, Bulteno (de studentaj E-istaj organizaĵoj) kaj de julio 1932 ĝis hodiaŭ La Suda Kruco.

Bulgarujo. B. estis inter la unuaj landoj, kiuj propagandis E-n, eldo-

nante Mondlingvisto kaj La Espero en 1889—91. Sekvas 1902—04 la be'e ilustrita ampleksa Rondiranto, Trumpet-isto, Unua Paŝo kaj Lumo (ilustr.), kiu en okt. 1907 fariĝis of. org. de BEL. Ĉe la 4-a bulgara kongreso aŭg. 1910 oni decidis, eldoni kune kun la rumanoj, unuigante Lumo-n kaj Rumana E-isto-n, komunan organon Danubo. Kun ĝia ĉeso en julio 1912 malaperis la lasta of. org. antaŭmilita. Krom la nomi aj aperis ankoraŭ la jenaj bonaj gazetoj: Bulgara E-isto, Junulo, bulgara eldono de E (Journal, Genevo), Semo (32×47 kaj 24×32), Kulturo (1914—15:31×24; reaperis 1929—kelkfoje kunpresita kun Telegramo—47×32 kaj 42×29) kaj tre stranga gazeto: 2 paĝoj portas la titolon Bulgara eldono de Rumana Gazeto E-ista kaj la 2 aliaj »Daodono unaversala federala respubliko« kun tekstoj kaj gramatiko de tre konfuza nova mondlingvo (bazita ŝajne je E) de iu d-ro Diadono en Sofia. Post la milito la ligo kun la jam en 1911 ŝanĝita nomo BEA komencis eldoni en sept. 1919 Bulgara E-isto; kiu ĝis hodiaŭ restis of. org. Por liberigi BE de la propaganda balasto, oni kreis en sept. 1925 specialan prop. gazeton E, sed devis jam cedi la eldonon en fino 1926. Plue eliris: Balkana Konkordo (jan.—sept. 1931, provo por kunigo de la E-movadoj en B., Greklando, Jugoslavujo kaj Rumanujo) kaj aliaj gazetoj. La laboristoj eldonis: Balkana laboristo kaj Lingvo Int.

Rumanujo. De komenco en R. kontraŭbatalis (pli akre ankoraŭ ol en aliaj landoj) 2 partioj: 1) »Federacio de la E-istaj Societoj el R.« (Fischer) kaj 2) »Rumana E-ista Soc.« (d-ro Robin). 1) eldonis en marto 1908—1910 Rumana Gazeto E-ista kaj 2) en apr. 1908—aŭg. 1910 Rumana E-isto en marto 1909 prop. n-ron E kaj de okt. 1909 kune kun la bulgaroj E-istoj Danubo. En 1923 oni kunigis la tutan rumanan E-movadon en la RES, kiu laŭbezone eldonas Informa Bulteno-n, sed R. entute ŝajnas esti ankoraŭ paralizita per la antaŭaj kontraŭbataloj. Plue aperis: E (jan. 1925-sept. 1926), La Homo kaj E-istul (aldono al rum. gazeto Mareo Noastra).

Greklando: Antaŭ la milito

Greklingva E-ano poste Greklingva E-isto. Post la milito: Samosa E-isto kaj Lingvo Int. (aperanta ankoraŭ hodiaŭ).

Turkuj o. Bizantio.

Azio.

Japanujo. Ĉar la japanoj ĝenerale ne konas la latinajn literojn kaj ankau jam havis — oni povas diri — la anglan lingvon kiel helplingvon, estis tre malfacile trovi adeptojn por E. Tamen jam en junio 1906 fondiĝis JEA, kiu en aŭg. 1906 komencis eldoni La Japanan E-isto. La progresoj venis tre malrapide kaj JE eĉ dum 1912 kaj 1913 devis ĉesi por reaperi jan. 1914 tre modeste kaj dumonate. Tio ŝanĝiĝis post la milito, kiam J. komencis plivastigi la eksterlandajn rilatojn. Hodiaŭ la E-vivo estas en J. pli vigla ol en iu alia lando. La japanoj multe ŝatas legi aŭ mem traduki kaj eĉ mem verki bonajn poemojn kaj prozaĵojn, per kio klariĝas la aporo de proksimume pli ol 70 plej multe aŭt., ofte bele kaj mankolorigite ilustritaj grupaj kaj similaj periodaĵoj. Post la milito oni trovas en ili multajn studojn pri lingvoscienco, sciencoj kaj budhismo. Plej rimarkindaj estas el la presitaj: Bulteno de HCE, La Revuo Orienta (of. org. de JEI, kiu en 1919 anstataŭis la asocion), La Verda Ombro (Formozo), Verda Utopio, Verda Gloro poste Verda Mondo, Nova Sento, La E-isto (of. org. de JEA, kiu nun denove aperas). Interesan ĉenon montras la jena evoluo: Eklumo, poste: E en Nipponlando, poste: E Lingvo Int., poste: E Kiboŝa, kiu ĉesis pro ekonomiaj kaŭzoj en junio 1933 kaj naskis 2 (!) novajn gazetojn: E en Japanujo kaj E Lingvo Int. Laboristajn gazetojn eldonis nur la klasbatala flanko: Int. Proleta Korespondo, Proleta E-isto, Kamarado (bela, ilustr.) ktp. Diversaj japanlingvaj laboristaj gazetoj akceptis E-parton.

Ĉinujo. La unua ĉina gazeto aperis en Parizo, bele litografita kaj aranĝita kun multege da zorgo kaj amo, estis Hina E-a Revuo poste Hina E-a Revueto. Ĉar en Ĉ. la presigo de E-gazeto estis ankoraŭ pli malfacila ol en Japanujo, la unua gazeto presita estis nur La Mondo (nov. 1911). Sekvas Hina E-isto, La Verda Lumo, Ori-

ento, La Espero kaj 12 aliaj. Klasbatalaj gazetoj aperis en Ĉ. pli frue ol en aliaj landoj: Hina Socialisto, Voĉo de la Popolo (multfoje malpermesata, sed ĉiam oni trovis vojon por denove eldoni n-ron, mi vidis 33 n-rojn), kaj 4 aliaj.

Filipinaj Insuloj. v. sub: Filipina E-isto.

Brita Hindujo. Dum 1906—08 aperis du bonaj gazetoj: La Pioniro kaj La Stelo de l' Oriento sed la eldonantoj ne estis indiĝenoj kaj la situacio ŝajnis same kiel ĉe la Filipinaj Insuloj: kiam la fervoraj iniciatintoj forlasis la landon, la movado ĉesis. Ankaŭ la provo en 1925, eldoni La Mahaprakaso (La Torĉo-Lumo de E) tion ne povis ŝanĝi. De nov. 1933 aperas en Bruselo gazeto Hindujo por klerigi la E-istaron pri la hindaj vivo kaj aferoj.

Nederlanda Hindujo. Ĝi havas tre modestan movadon ek de 1923, kiam la Ned. Indische E Vereen eld. prop. folion E. De nov. 1925 aperas la unua E gazeto eldonata de indiĝenoj: Hinda E-isto, of. org. de la Unuiĝo de Ĝ E-istoj en Ned. Hindujo.

Ameriko.

Kanado. Pri la unuaj gazetoj L' E-iste Canadien kaj La Lumo vidu je la komenco de ĉi tiu artikolo. Provo enkonduki E-n inter la eskimoj per Eskima E-isto tute malsukcesis. La Ligo inter Kanadaj E-istoj kaj aldono al la kanada gazeto The Northern Tribune: Canadien E-iste ne povis revivigi la antaŭe tiel vigan movadon.

Usono. La unua gazeto estis Amerika E-isto (okt.—dec. 1906 L'AE). La en 1905 fondita AEA ne elektis ĝin kiel of. org., sed kreis novan The American E Journal. Nur post la unua kongreso en Chautauqua 1908 fine AE fariĝis la of. org. de la asocio kaj restis tia ĝis hodiaŭ. La krizon, kiun travivis en 1933 U., ankaŭ travivis la asocio kaj ankaŭ AE: la unuan fojon dum sia 27 jara ekzistado ĝi aperas ek de nov. 1933 aŭtografite. Entute aperis — laŭ la praktika emo de la enloĝantoj — nur malgranda aro (ĉ. 25) da gazetoj, plej multe instruaj aŭ de bonfaraj societoj.

Meksiko. En 1904—10 aperis 6

bonaj kaj ampleksaj gazetoj: La Meksika Lumturo, Verda Stelo, E-a Gazeto, Meksita Revuo, E-a Meksiko kaj Meksika Stelo kaj per ili la fervoro ŝajnis eluzita. Post la milito M. C. Rodriguez provis ankoraŭ unufoje per Arguso ekflamigi la movadon, sed vane.

Kostariko: E-Skarabaro, jan. 1906.

Respubliko Dominikana: Zamenhofa Revuo, marto 1911.

Kuba: Cuba E-ista aŭg. 1910, Latinamerika E-isto, Kuba Interŝanĝo (bela kaj valora).

Portoriko: La Gazeto, marto 1906.

Jamaiko: The Jamaican E-ist, jan. 1907.

Argentino: Inter la sudamerikanaj ŝtatoj A. kaj Brazilo estas la solaj, kiuj konservis ĝis hodiaŭ malgrandan sed konstantan E-an vivon. Krom la of. org. de la landa Asocio: Argentina E-isto, kiu aperas de jan. 1917, ekzistis 8 aliaj gazetoj.

Brazilo havas la feliĉon, kiun ĝi kune nur posedas kun Svedujo (Nylén), ke de la komenco ĝis hodiaŭ la animo de la movado — d-ro E. Backheuser — restis la sama, kaj kun li ankaŭ la of. org. Brazilo E-isto (dum la unua jaro nomita: Brazilo Revuo E-ista). Do, la aliaj gazetoj (3) ne povis atingi iun influon.

Gvatemalo. En 1905 kaj 1906 aperis la Verda Radio kaj Centramerika E-isto, sed sen iu sukceso, UEA eĉ ne havas delegiton en tiu lando.

Ĉilo. Kvankam en Ĉ. aperis EL E kiel la unua E-gazeto en tuta Ameriko, kaj kvankam antaŭ la milito la E-vivo estis tre vigla, hodiaŭ ĉio estas frankvila. Aperis ankoraŭ aliaj 3 gazetoj.

Kolombio. Kolombia Stelo (sept. 1909—12 kaj 1 n-ro en marto 1931). Aperis ankoraŭ 3 aliaj.

Paragvajo. Moderna Ideomo.

Peruo. La dua gazeto en Ameriko estis Antaŭen E-istoj, ĝi aperis tute regule monate dum 8 plenaj jaroj, kion neniu gazeto antaŭ ĝi kaj nur multaj post ĝi atingis.

Urugvajo. Urugvaja Samideano kaj Sudameriko.

Venezuelo. Anda Lumo kaj Verda Stelo.

Afriko.

Alĝerio. Pro la vigla interrilato kun Eŭropo kaj precipe Francujo E en Afriko unue eniris A.-n, kie jam en febr. 1905 aperis la unua n-ro de duonmonata gazeto La Alĝeria Stelo kaj ni tuj komprenas tion, se ni serĉas la iniciatinton: A. Capé. Plue aperis: Afrika E-isto (aŭt.) kaj Alĝeria Informilo.

Maroko: Maroka Stelo.

Tunizio: Tunizia Espero.

Egipto: Egipta E-isto.

Sudafriko: The South African E-ist, julio 1911.

Aŭstralio.

La antaŭmilita gazeto: La Aŭstrialia Verda Stelo, The Aŭstrialian E-ist (poste fako en Benalla Independent) kaj The New Zealand E-ist havis nur mallongan vivon. De julio 1920 aperas regule monate La Suda Kruco, of. org. de AEA.

En la antaŭa parto estas pritraktitaj la landaj propagandaj, grupaj, federaciaj ktp. gazetoj, preskaŭ senesepte skribitaj en naciaj kaj E-a lingvoj. Nun sekvas la fakaj gazetoj, plejmulte skribitaj en E.

Faka Gazetaro.

Lingvoscienco. Kiel unuan tian gazeton ni povas jam rigardi La E-isto, kiu enhavis multajn lingvajn klarigojn de Z, de Wahl k. a. Simile estas Lingvo Int., Linguist, plue: E-a Evoluo de H. Sentis en Grenoble, Lingvo Cosmopolita de Saussure kaj Mond-Lingvo de J. Weisbart en Nürnberg. La gazeto, kiu havis antaŭ la milito en lingva kaj organiza senco la plej grandan signifon, estis: Oficiala Gazeto E-ista, eldonita de la E-ista Centra Oficejo. La E-ista Akademio kreis en junio 1929 laŭbezone aperantan Oficiala Bulteno-n, por iom anstataŭi la OGE.

Scienco. Jam antaŭ la milito okazis sciencaj kongresoj, je kiuj estis permesataj 5 diversaj lingvoj, i.e. estis babelaj kaosoj. Pro tio oni ne povas miri, ke ĝuste en sciencaj gazetoj jam frue aperis artikoloj favorantaj la akcepton de E. Jam en 1904 P. Fruictier en Parizo riskis eldoni la unuan sci-

encan gazeton skribitan en E. Int. Scienca Revuo. Regule aperis ĉiumonate kajero de IV+32 p. 27×17. Kiam en 1906 oni fondis en Genevo la Int. Scienca Oficejo E-ista-n kiel antaŭiranton de ISAE, prenis sur sin la redaktadon Saussure, sub kiu la gazeto bonege prosperis kaj pliampleksiĝis. Sed Saussure skribante sub pseŭdonimo Antido, pli kaj pli uzis la gazeton por diskuti reformojn en E kaj eĉ kiam d-ro Thalwitzer en Kützschenbroda prenis sur sin la redaktadon en jan. 1911, la gazeto jam estis kondamnita al morto kaj malaperis en la sama jaro. Saussure provis daŭrigi la gazeton sub la titolo La Teknika Revuo de jan. 1918—junio 1919. En junio 1922 d-ro Döhler en Riesa forsendis Informilo pri la stato de ISAE kaj ĝia Revuo kaj sekvigis en julio—sept. novan serion de Int. Scienca Revuo, kiel organon de ISAE, sed pro financaj kaŭzoj en junio 1923 oni devis ĉesigi la eldonon. Por havi organon Rollet de l'Isle redaktis dum 1925 dumonatan aldonon al E (UEA): Scienca Bulteno kaj de jan. 1926 ĝis hodiaŭ li eldonas trimonate Bulteno de ISAE IV+12—16 p., 24×16. — Ankaŭ por restarigi Int. Scienca Revuo-n Ch. Verax starigis en jan. 1912 Scienca Gazeto-n, kiu aperis tute regule ĝis jul. 1914 (VIII+16—18, 25—18; ĝi estis of. org. de ISAE. — Jam en okt. 1906 Verax fondis alian sciancan gazeton: Foto Revuo Int. Ĝi enhavis bonajn artikolojn el ĉiuj partoj de la fotoarto, sed malaperis jam en junio 1907 (entute 132 p. 25×17) — K. Froding en Madison komencis en jan.—febr. 1932 eldoni Scienca Gazeto E-a (de majo—julio 1932: Scienca Gazeto.)

Por eluzi la observojn de la diversaj meteorologiaj stacioj la uzo de mondlingvo povas esti grandvalora kaj jam antaŭ la milito oni dufoje provis E-n por tiu celo. En apr. 1909—nov. 1910 aperis en Durango (Meksiko) Monata Jurnalo (post julio 1909 Monata Gazeto) de la Met. Observejo de l' Instituto Juarez kun multaj met. tabeloj (ĝis junio 1909: 8 p. 32×21 poste: IV+16, 21×17). En jan.—dec. 1911 R. Duyos eldonis en Valencia eĉ semajnan met. gazeton La Korespondanto (entute 44 kajeroj po 12 p. 22×16.) —

La vigla estro de la Aerologia Observatorio en Tateno (Jap.) d-ro W. Oishi eldonas jam de jan. 1927 tute regule trifoje monate Bulteno), enhavante tabelojn kaj diagramojn; ĉiu n-ro enhavas 4—6 p. 27×20. Por pli detaligi la datojn, aperas ĉiujare ampleksa Raporto parte ilustrita kun 136—332 p. 30×23. Krom tiuj la observejo eldonas dufoje ĉiujare: Observadoj meteorologiaj kaj aerologiaj faritaj en la Aerologia Observatorio de Tateno IV+54 p. 26×19. Tiu agado de d-ro Oishi estas vere progresema, sed tro malmulte atentata.

La penoj konkondi E-n en Radio estis vere grandegaj, sed la sukceso ne estis ĝis nun daŭra. La Int. Radio-Asocio eldonis en marto 1924 (tuj post ĝia fondo) malgrandan Bulteno, unue aŭt. poste presitan kaj jan. 1926—jan.—febr. 1927 sub la redaktado de d-ro P. Corret Int. Radio Revuo-n, vere bonan fakan gazeton kun multaj ilustraĵoj. Estas rimarkinde, ke tiu gazeto aperis ankaŭ en Braille-skribo por blinduloj. En apr. 1924 aperis en Lugano grandformata Int. Radio-Revuo, Radio-Servo kun eldonoj en angla, franca kaj germana lingvoj. Aperis nur 2 n-roj po 8 p. 47×32. Periodaĵo, kiu ĝis nun ricevis la plej favoran influon kaj ankaŭ estas atendata de la ne-E-ista gazetaro, estas la E-Radio-Programo de la Int. Radio-Servo eldonita de J. Jungfer en Lübben; de apr. 1928 ĝi aperas seninterrompe, unue monate, nun ĉiusemajne. Krom la Programo eldoniĝas ankoraŭ Cirkulero kaj Oficiala Informilo. La »Radio-Club E-iste de France« eldonas de 1930, redaktita de la fervora kaj lerta H. Favrel en Parizo, Radio-E en franca kaj E-a lingvoj (16—28 p. 24×16). La sama klubo eldonas de dec. 1932 aŭt. SOS, redaktata de E. Houzè en Dunkerque. Similan monatan bultenon eldonas de majo 1931 radio-amikoj ĉe la Brita E-Asocio nomita Tra La Poŝto, kaj de nov. 1931 W. Krzysztofowicz en Bydgoszcz sub la nomo Int. Radio-Servo por Polujo neregule, aŭt.

Kiel sciencajn gazetojn ni devas ankoraŭ mencii: Grafologia Revuo, Barcelono; La Int. Societo de Skrib- kaj Libro-Scienco, Dresdeno, nur unu prov-

kajero en 1929; de dec. 1928 Amikeco de la Rotariz E-Amikaro; Politika Sociala Revuo, Paris; estis intencate eldoni ĝin kvaronjare, sed ĝis febr. 1934 aperis nur la provn-ro (julio 1932) kaj la unua n-ro (marto 1933) kun IV+80 p. 25×17 kun bonegaj artikoloj pri ĉiaj problemoj de la socia vivo.

Plua fako de la scienco estas la Medicino: La int. interŝanĝo estas precipe grava por la kuracistoj. Jam en jan. 1906 Verax kaj d-ro Vallienne provis eldoni en Parizo Int. Revuo Medicina en E, germ., angla, hisp., franca, itala kaj aliaj lingvoj, sed pro manko da abonantoj, la gazeto devis ĉesi kun la 4-a n-ro en apr. 1906. En marto 1908 la serioza kaj prudenta d-ro Mikolajski en Lwów komencis aldoni al la pola medicina gazeto Głos lekarzy E-an folion Vecho de Kuracistoj. Ĉar li ricevis sufiĉan nombron da abonantoj, en marto 1908 li memstarigis ĝin kaj nomis ĝin de jan. 1909 Voĉo de Kuracistoj. Post la fondo de TEKA dum la UK 1908 la Voĉo fariĝis ĝia organo. Sed jam antaŭ la unua kongreso de TEKA en Augsburg 1910 komenciĝis malagrablaj disputoj inter tiu serioza, honesta kaj trankvila d-ro M. kaj TEKA (plej multe instigata de spontanea, sed malserioza kuracisto d-ro Thalwitzer). Kaj dum la kongreso oni decidis, ke Voĉo ne plu estu of. org. De jan. 1911 Thalwitzer eldonis novan of. org. Int. Medicino. Multaj kuracistoj nun forlasis la Voĉon kaj je la fino de 1911 d-ro M. estis preskaŭ sola kaj devis ĉesigi la eldonon. Sed Thalwitzer estis granda seniluziigo por TEKA! Estante ne tiel persistema kiel d-ro M. li liber-kore forlasis la eldonon de Int. Medicino jam post la dua n-ro, kiam li vidis, ke oni per ĝi ne povas gajni trezorojn. (Oni trovis similan okazon jam kelkfoje en E-ujo, ke sperta, serioza kaj trankvila laboranto estis subpremata de fanfaronulo kaj fine ambaŭ pereis.) Ĉar la manko de propra organo estis malagraba, TEKA eldonis en Parizo de aŭg. 1911 ĝis komenco de la milito Oficiala Bulteno de TEKA sub la redaktado de d-ro H. Dor. Tamen TEKA ne estis vivkapbla sen scienca periodaĵo; pro tio

oni decidis dum la UK 1912 eldoni krom la bulteno sciencan organon Kuracisto kaj komisiis la kolegojn en Varsovio (d-ro Chybczinski kaj d-ro Robin) pri la redaktado. Ĝi regule aperis de okt. 1912 ĝis junio 1914. Post la milito nur en sept. 1923 d-ro Mezei en Budapeŝt riskis denove akcepti la eldonon de Int. Medicina Revuo, kiu tuj fariĝis of. org. de TEKA. Ĉar pro financaj kaŭzoj li ne povis daŭrigi la eldonon, d-ro Briquet en Lille (helpata de prof. Vanverts) prenis sur sin tiun taskon de jan. 1926. En jan. 1929 la gazeto transloĝis al Bruselo sub la redaktadon de d-ro Kempener kaj poste de prof. Vanverts. — Krom tiuj int. medicinaj gazetoj aperis naciaj en diversaj landoj. En Rusujo unue kuniĝis kvanto de kolegoj por fondi la »Tutruslanda E-a Kuracista Societoe, kiu de junio 1911 ĝis komenco de la milito eldonis propran Bulteno. En julio 1924 G. Georgiev en Bulgarujo eldonis Medicina Heroldo. Kier sur ĉiuj sciencaj kampoj post la milito, la japanoj estis ankaŭ tre viglaj sur la medicina. Precipe E-aj grupoj en universitatoj eld. aŭt. gazeton, kiel ekz. Medicino (Osaka) Psikiatrio; Psikologio kaj Neŭralogio (Tokio); Psikio (Tokio); Nia Bulteno (Nogaya); Bulteno de M. E. S. (Sendaj). Tute speciala kaj vere rimarkinda estas: Bulteno de la Jurmedicina Instituto de la Medicina Fakultato de Nagasaki, presita en jap. kaj E lingvoj 26×19; aperis en 1920 du kajeroj kun 203 p., 1930 kvar kajeroj kun 573 p., 1931 tri kajeroj kun 470 p., 1932 tri kajeroj kun 440 p. — El la farmacio aperis ankoraŭ: Voĉo de Farmacistoj sept. 1910—11 kaj Farmacio & Hemio (Tojama) 1924—25.

P e d a g o g i o. Gajni la instruistojn por iu movado estas tre grava pro la influo, kiun oni gajnas per ili je la infanoj. La unua gazeto estis la hisp. La Educacion La Edukado en Almeria, kiu aperis en hisp. kaj E lingvoj. La eldonon de pure pedagogia gazeto oni jam preparolis dum la UK 1907, sed nur en nov. 1908 du entuziasmaj E-istoj en Bystrice-Hostyn, la instruistoj Ĉejka kaj Krumpholtz, eldonis la unuan n-ron de Int. Pedagogia Revuo. Pro financaj kaŭzoj ĝi devis ĉesi en la fino de 1910. En 1912 Jan Ja-

cobs en Antverpeno reprenis la eldonon, plenumis ĝin ĝis julio 1914 kaj reeldonis ĝin post la milito de aŭg.—sept. 1921—junio—julio 1922. IPR estis organo de la Int. Asocio de Instruistoj, kunigo de burĝmoderaj instruistoj. Post la milito eniris ankaŭ en la vicojn de la instruistaro la ideoj de proletaro kaj de klasbatalo kaj multaj ekŝiĝis el IAI por fondi TAGE. Tiujn ideojn esprimis la gazeto Novaj Tempoj. En jan. 1927 ĝi akceptis la titolon Int. Pedagogia Revuo, kiun ĝi havas ankoraŭ hodiaŭ. De tiu tempo la gazeto estas plie faka gazeto kaj forlasas la akran klasbatalan programon. Por disvastigi la klasbatalajn ideojn tra la tuta tero, Boubou en Orléans eldonas de febr. 1925 Tutmonda E-ista Pedagogia Servo. Rusa pedagogia gazeto en Harkov eldonas de jan. 1926 resumfolion La Vojo de Klerigo, kiu havis dum kelka tempo ankaŭ francan kaj germ. aldonojn tradukitajn laŭ la E-teksto. La n-ro de jan. 1931 havis la titolon Komunisma Klerigo. Por informi pri la sovetaĵ ideoj kaj disvastigi ilin, oni eldonis en Moskvo de majo 1929—majo 1930 Soveta Pedagogia Revuo, kiu poste fariĝis Soveta Pedagogia Biblioteko. — Krom tiuj gravaj gazetoj ekzistas ankoraŭ sciigoj de ligoj, kiel ekz. Vereinsmitteilungen, E-Vereinigung deutscher Lehrer; E-Vereinigung Sächsischer Lehrer; Bulletin de SIEF (Sveda Instruista E-Federacio).

Literaturo kaj arto. Granda estas la aro de tiuj ĉi gazetoj kaj multaj valoraj estas inter ili, sed la vivdaŭro ĝenerale estis nur mallonga. La sola el la antaŭmilita tempo, kiu reaperis post la milito, estas Marto; ĝi (unue kiel La Marto) aperis de nov. 1910 ĝis komenco de la milito, reaparis 1922 kaj ĉesis dec. 1933 post finiĝo de la 17-a jaro. La Revuo daŭris dum 8 plenaj jaroj, kaj ĝi certe aperus ankoraŭ hodiaŭ, se la milito ne estus veninta. Literaturo (Londono) aperis dum 7 jaroj, La Vagabondo dum preskaŭ 7, Lit. Mondo dum 6½ (la plej grava lit. revuo post la milito), Eho E-ista dum 6, La Nova Epoko, kiu havas jam 3 epokojn, dum entute 5, Tra la Mondo dum 3½, Samideano ĉiumonata (bele ilustrita per mankolo-

igitaj jap. bildoj) 2 jarojn. Ĉiuj aliaj aperis nur pli mallonge, mi nomas: Hispana Revuo, La Bela Mondo, La Duonmonata, Universo, Literaturo (Malmö), E-ista Voĉo (Jaslo), Samideano, Tutmondo E-a (Stuttgart, 3 n-roj), Bibliografia Gazeto (kiel daŭrigo aperas Lingvo Libro, organo de AELA), kaj E-a Mondo (Hannover), kiu volis fariĝi la daŭrigo de La Revuo, sed jam ĉesis post la unua n-ro. La saman sorton havis E-Roman-Gazeto, kiun F. Ellersiek provis eldoni en julio 1933. La rusoj revivigis en apr. 1932 la malnovan La Nova Epoko per La Nova Etapo. Ni devas menciĝi ankoraŭ Nia Informilo de Isosek kun bonaj verkajoj kaj tradukoj de la Lernantoj mem. Diversaj alispecaj gazetoj havis lit. aldonojn kiel ekz. Lingvo Int., Ĉasopis Ceskych E-istu, Germana E-isto, HDE, k. a.

Komercio. Jam en febr. 1907 aperis en Frankfurt a. M. Ekspert-Jurnalo 16 p. 31×23 kun multaj anoncoj (grandaj kliŝaĵoj), sed restis la sola kajero. En jan. 1909 E. M. Pope eldonis en Chicago Export E-ist en angla kaj E lingvoj, sed kvankam li jam en julio de la sama jaro devis ĉesigi la eldonon, li denove eldonis ĝin en 1922-24. Tre bonan Int. Komerc Revuo-n aperigis en sept. 1919—aŭg. 1922 d-ro H. Unger en Zürich kun bonegaj ekonomiaj artikoloj kaj precipe propagandante la diversajn foirojn. Serioza kaj iom laborante kun gajno estas la Komercista E-Unio en Dresden, kiu eldonis de febr. 1927 KEU-Informilo, kiu hodiaŭ nomiĝas La Komercio. Aperis ankoraŭ 5 aliaj gazetoj.

Profesioj. Pro la ĉiam pli kaj pli internaciiginta krimularo la polico devus havi la plej grandan intereseon je interpopola komprenigilo. Tion frue ekkonis A. Marich en Budapeŝt, kiu eldonis jam en sept. 1908 Polica Revuo. La E-isto en Leipzig havis en 1911 aldonon Polica E-isto. Post la milito Marich fondis Tutmonda Polica Ligo-n kaj de apr. 1922 ĝis majo 1928 eldonis gazeton La Policisto. Sed li ne sukcesis kunigi la tutan int. movadon pro sia aŭtokrata kaj diktatora maniero, bankrotis ĉio de li fondita kaj en 1930 fondiĝis Int. Polica Ligo, kiu uzis kiel organon E (UEA), kaj de

jun. 1933 Int. Polica Bulteno (kun la sama titolo aperis gazeto ankaŭ de apr. 1911 ĝis jul. 1924).

La oficistoj de la poŝto ne agis malpli vigle. Dresdena E-poŝtunuigo eldonis de majo—dec. 1910 aŭt. Poŝta E-isto, kiu en jan. sept. 1911 fariĝis parto en La E-isto (Leipzig) kaj de okt. 1911 ĝis komenco de la milito memstara kaj organo de la ILDEPO, kiu post la milito nomiĝis ILEPTO. En okt. 1922 eliris La Interligilo de l' PTT, kiu ricevis la gvidadon de la poŝta movado, je kio ankaŭ Marich ne povis ion ŝanĝi per sia Ligo de Ordo, en kiu li volis kunigi ĉiujn »ordajn« oficistojn (polico, poŝto, fervojo, ĵurnalistoj ktp.) kaj ties organo estis la jam citita La Policisto, kiu ricevis por tiu celo multajn specialajn aldonojn.

Tria profesio estas tiu de la tervoj, kiu pli konforme laboris kaj havis la asocion IAEF kun la organo Fervoja E-isto kun kiu unuiĝis en jan. 1913 la Germana Fervoja E-isto. Post la milito la asocio restariĝis kaj la ĵus menciita Ligo de Ordo ne povis influĝi. Ĝia nova organo estis Fervoja E-isto poste La Fervojisto, krom kiu aperis ankoraŭ represoj el E (UEA), Oficiala Informilo. Specialaj landaj bultenoj eliris en Germanujo, Hispanujo, du en Japanujo, Svisujo ktp.

Kiel profesiaj gazetoj aperis plue: La Barbiro, La Publikoficisto, La Ĵurnalista, La Bankoficisto ktp.

Studentoj. Kvankam en kelkaj landoj, kiel ekz. Germanujo, Hungarujo (La Pioniro) kaj Bohemujo (Studento) la E-a studenta movado bone ekfloris en diversaj jaroj, la int. movado ne progresis. La en 1909 fondita »Ĉiostudenta Asocio« eldonis de 1910—12 Ĝstudentaj Intereso. Krom ĝi ekzistis »Universala Studenta Unio« kun organo La Tribuno (Utiel, Hisp.). Provoj revivigi la movadon post la milito ne sukcesis.

Blinduloj. Estas konate, ke la blinduloj legas per la Braille-punktskribo, kies produktado estas treege multekosta. Do estas nature, ke precipe en la lingvoj kun malmulte da uzantoj, ne ekzistas multaj libroj en Braille-skribo kaj oni komprenos facile, ke per la interligo de E tiu malfacilaĵo

malaperos. Tion komprenis jam tre frue prof. Cart, kiu jam de majo 1904 fondis E-a Ligo en Braille-skribo, aperanta monate ĝis hodiaŭ (nur interrompita dum la milito 1916—19) kaj de jan. 1913 eldonita de Harald Thilander en Svedujo. Nur por Svedujo Thilander eldonis E-Folket poste Nordisk-E Tidning. En Germ. aperis 1913 Lingvo Int. (en blindulejo en Paderborn) kaj de sept. 1922 aperas en Kolonjo Blinda E-isto. En Praha eliras de jan. 1920 kiel aldono al boHEMA gazeto Zora kaj de jan. 1922 memstara Aŭroro. En 1926 aperis Int. Radio Revuo ankaŭ en Braille-skribo kun desegnaĵoj. En 1925 oni fondis apartan gazeton, neregule aperantan, por informi, klarigi kaj interesigi la vidantojn pri la blindula afero: Ligo por Vidantoj.

Junuloj. La unua gazeto estis Juna E-isto. Sekvas por la franca federacio Juneco (Parizo), por la Tutmonda Junula Asocio Junula Parolo (Magdeburg) kaj en Nederlando La Estonto. En 1920 estis fondata la unua vivpova junula unuigo Universala E-a Asocio Junulara, hodiaŭ nomata Tutmonda E-Junulara Asocio, kiu eldonis E-ista Junularo. Post ĝia malapero oni provis per Juna Samideano poste Juna E-isto (ambaŭ en Krakovo) krei novan organon de la asocio, sed sen sukceso. Menciindaj estas ankoraŭ E-ista Junularo (Vieno, Kornfeld), Juneco (Oppeln) kaj bela, bone ilustrita gazeto por infanoj La Etulo. Specialan klason formas la skoltoj. Tuj post la fondo en 1918 la Skolta E-ista Ligo havis parton La Selo en la angla gazeto Brown & White, eldonis en 1921—22 propran bultenon Skolta E-ista Ligo kaj akceptis en julio 1926 la gazeton Skolta Heroldo de pastro Ramboux en Parizo, kiun ili anstataŭis en sept. 1931 per Skolta Bulteno (London). La hungaraj eldonis por la jamboreo aŭt. Cirkulero kaj Tendara Heroldo. Por la »Tago de Bonvolo« (18 majo) oni eldonis en 1933 krom la naciaj unufoje ankaŭ E-an eldonon de La Junularo kaj la Mondpaco.

Laboristaj kaj klasbatalaj. En 1906 fondiĝis Tutmonda Labora Societo kun organo Laboro. Preskaŭ samtempe eliris Rondiranta Fo-

lio por la kreado de Tutmonda (poste: Int.) Socia Revuo, kiu en jan. 1907 fariĝis Int. Socia Revuo. UEA fondis en 1911 specialan laboristan fakon kaj donis al E specialan aldonon Laborista Bulteno. Tuj post la milito la franca gazeto Le Travailleur E-iste havis rubrikon kaj poste aldonon en E: E-ista Laboristo; en febr. 1920 ĝi fariĝis memstara, por akcepti en okt. 1921 la titolon Sennacieca Revuo, aperante monate kun la formato 30×22. De okt. 1923 ĝi havis sub la sama titolo literatur-sciencan aldonon kun la formato 23×14, kiu estis la daŭrigo de La Nova Epoko (Moskvo). En okt. 1924 ĝi akceptis la titolon Sennaciulo kun formato 32×23 kaj oni daŭrigis la aldonon memstare sub la titolo Sennacieca Revuo kaj kun la malgranda formato de 23×14 (enhavo: Literaturo-Scienco-Pedagogio) ĝis sept. 1928, por reakcepti de okt. 1928—febr. 1933 la titolon La Nova Epoko kaj de marto 1933 denove la titolon Sennacieca Revuo (31×23). Sennaciulo aperis ĉiusemajne ĝis jan. 1932, dusemajne ĝis jan. 1933 kaj de febr. 1933 monate; ĝi havas monatan aldonon La Lernanto. Spite la devizo »Proletarioj tutmondaj unuigu vin«, regis granda disigo kaj bedaŭrinda kontraŭbatalo. Ni vidas tion jam el la gazetoj: antaŭ la milito Int. Socia Revuo kunigis ankoraŭ ĉiujn laboristojn (krom kelkaj malgrandaj grupoj kiel ekz. la anarkistoj ktp.), sed post la milito ĉio ŝanĝiĝis. Krom la cititaj SAT-gazetoj ni trovas nun: Service de la Presse (eldonita en nov. 1924—33 tute en E aŭt. de la Int. Asocio de la Laboristoj) kaj Libera laboristo (de la Tutmonda Ligo de E-istaj Senŝtatanoj en aŭg. 1925—aŭg. 1931). La ĵus citita asocio kaj ligo kunigis en 1932 kun la anarkistoj en la Int. Laborista Asocio kaj eldonis E Revuo. Plue mi citas: Informservo (de Anarkista Junulara Internacio), Internaciisto (de SAT-opozicio poste Internacio de Proleta E-istaro, inspirita de la rusoj) aperanta en Berlino kaj post la germ. reĝimsanĝo en Moskvo sub la nova titolo Sur Posteno, La Anarkisto (Tokio), I. S. K. (Internacio de Socialista Kunlaboro, kun bonegaj artikoloj pri socialismo, ekonomio ktp.) daŭrigata post marto 1933 per

La Kritika Observanto (Malakoff, Francujo), Cirkulero (de Socialista Frakcio), Ĉirkaŭ la Globo poste Sennaciista Bulteno (aperanta en New York) kunigita en jan. 1933 kun la germ. Sennaciista Bulteno (aperanta en Stuttgart), kiu poste estis translokata al Pilzeno, Proleta Studento, Fajrero. Menciindaj estas ankoraŭ la Proleta E-Korespondanto, kiu aperis en multaj lingvoj kaj volas doni materialon al la nacia gazetaro.

Religio. La katolikaj gazetoj okupas la unuan lokon kaj plej unue Espero Katolika, kiu aperas de dec. 1902 ĝis hodiaŭ (interrompita dum la milito kaj kelkfoje dum la ekonomiaj krizoj, kiu kauzis, ke IKUE eldonis de 1923—25 Komunikoj-n. Post la milito la katolika movado disigis kaj fondiĝis Internacio Katolika kun Katolika Mondo kaj La Juna Batalanto. Tre bona kaj ampleksa estis Katolika Revuo (Hungarujo), Katolika Vivo kaj La Eklezia Revuo, (anglikana, gazeto, kiu akceptis kontribuadojn ankaŭ pri aliaj kristanaj eklezioj).

En la evangelia, protestanta ktp. movadoj la nomo de P. Hübner estas de la komenco ĝis hodiaŭ ligita kun la gazetaro. Li eldonis en 1906 aŭt. germ. bultenon Monatlicher Abendanzeiger, al kiu li donis en junio 1907 E-aldonon, kiu fariĝis en febr. 1908 E en la Servo de la Dia Regno kaj de jan. 1909 Dia Regno; ĝi ĉesis aŭg. 1914, estis en 1921—22 parto en Kristana Espero (Finnlando), denove memstara en 1923—24 kaj de julio 1932 ĝis hodiaŭ. Ĝi estis inf. org. de la Kristana E-ista Ligo Int., kiu parte ankaŭ eldonis Informilo-n. La fama gazeto European Christian Endeavour akceptis apud la angla lingvo en majo 1908 ankaŭ E-n kaj nomiĝis Eŭropa Kristana Celado.

De parencaj (teozofiaj, psikistaj, liberpensulaj kaj similaj) gazetoj aperis: Teozofia Revuo, Espero Teozofia, Revuo de E-a Psikistaro, Okultismo, La Spiritisto, Kristana Revuo, La Nov-Salem-Lumo, Novspirito, La Budhismo, Kristana Servado, Renkonte al la Suno (Mariavita sekto en Polujo), Atestado, La Vojo (kunigo de Biblia Tradukisto kaj Libera Penso) kaj Liberpensulo.

Pacifismo. La animo de ĉi tiu movado estis la kapitano K. Moch en Parizo. Li eldonis Espero Pacifista, Plue aperis Semo (Barcelona), Intermita Sciigo, La Federacio de la Mondo kaj La Militrezistanto, kiu aperas de okt. 1923 ĝis hodiaŭ.

Stenografio. La Revuo Int. de St. aperinte jam en 1904 volis publikigi la valorajn sistemojn el ĉiuj landoj (Groote, Scheithauer, Duployé, Stolze-Schrey). Estis tute klare, ke tiu entrepreno en tiu tempo ne povis sukcesi, do aperis nur du n-roj. Plue: Flugila Stelo (Stolze-Schrey), E-a Stenografiisto (Stolze-Schrey), Fluganta Skribilo (nov. 1913 ĝis hodiaŭ, Duployé), Int. Stenografio (Gabelsberger), Flugila Plumo (Stolze-Schrey), Int. Stenografiisto, of. org. de la IAES (de aŭg. 1923 ĝis hodiaŭ), Tutmonda Intersteno kaj Multlingva Intersteno (ambaŭ en Duisburg febr. 1930 ĝis hodiaŭ), La Int. Groote-ano.

Kolektado. Oni ne bezonas akcenti, ke por la kolektado helplingvo estas plej necesa. Tion komprenis unue la gazeto Schweizerpost, kiu en 1909 akceptis la titolon Monda Poŝto akceptante samtempe E-n; ĝi aperas ankoraŭ hodiaŭ. Plue estas rimarkindaj: La Unuiĝo de la Bibliofiloj, Tra La Filatelio, Sciiganto (Budapest), la diversaj organoj de la Int. Klubo Universo, Interŝanĝa Bulteno (aldono al E, Genevo), Bibliografio (Davidov), E-ista Filatelisto, Orange-Poste poste Batavo-News, Ko-Fi-Nu-Ko, Amikeco, La E-Kolektanto, Radio de Filintern (of. org. de »Filatelista Internacio«, kiu intencis, unuigi la proletariajn filatelistojn), Kolektanto, Int. Arĥivo (Tep-litz), E-Korespondado (Breslau), Filatelista Adresaro poste Tutmonda Kolektanto (organo de TAK) kaj La int. laborista filatelisto (Vieno).

Spritaĵoj. La unua kaj ĝis nur plej bela kaj plej bona spritaĵgazeto estis La Spritulo, kiu aperis grandformate dum tri plenaj jaroj. Simila estis Jen, sed ĝi daŭris nur unu jaron, La ridetanta E-isto nur duonan jaron kaj unu n-ro aperis nur de Moderna Humoro, La Pulo kaj E Spritulo. Specialaj gazetoj estas tiuj, kiuj ŝerce kritikas la E-istojn aŭ okazintaĵojn en la

grupoj kaj en E-ujo: La Konfidenculo, Jen (Zürich), La Vero kaj ankoraŭ hodiaŭ aperanta La Pirato.

Int. Unuiĝoj. La ĉefa de ĉi tiuj, kiu precipe nuntempe havas la plej grandan signifon, estas UEA. Ĝi akceptis kiel of. org. en 1908 la jam de junio 1905 aperantan gazeton E (Journal), kiu multe ŝanĝis la formaton kaj havis dum longaj jaroj multajn aldonajn bultenojn, kiujn mi parte jam menciis en la diversaj ĉapitroj. Nemenciitaj estis ĝis nun: Virina Bulteno kaj Anonca Bulteno. Plue UEA eldonis: Oficiala Bulteno kaj Cirkuleraĵoj Leteroj. Ankaŭ kelkaj distriktoj eldonis proprajn periodaĵojn: Teritoria Tribuno (ĈSR), Teritoria Bulteno kaj Oficiala Informilo (ambaŭ Jugosl.), Cirkulero de la nederlandaj UEA-delegitoj kaj same: -membroj.

De kulturaĵoj movadoj estis eldonitaj: Espero, Homaro, Oficiale Bulteno de L'Unio Satziokrata (Brazilo, kun iom ŝanĝita E), Monista-Samideano, La Unuigita Tuthomaro (jan. 1919 ĝis hodiaŭ), Ora Epoko E-ista, poste La Ora Epoko (aperas ankoraŭ hodiaŭ), La Kolportisto kaj La Rozumata Kruco poste kunigitaj al Inter Ni poste Kristana Servado. La nova tago (bahaa), Oomoto kaj Oomoio Int. kunigitaj en jan. 1933. Nova Ekonomia Politiko, Nova Kulturo kaj Frateco (Bulg.), Revuo Kultura (Jap.), Bahismo kaj E (Persujo), Konsolo, Etnografia Revuo (of. org. de Int. Ligo Frateco, Utrecht, Marich), Vegetarano, La Bontemplano, La Int. Abstinenta Observanto, Universala Unuiĝo, Verda Kruco (E-ista Tabakkontraŭula Asocio).

Plue la jenaj korporacioj: I. C. K.: Cirkulero, Int. E-Servo, Int. Gazetara Servo. — Int. Federacio de E-istaj Trafik- kaj Transportlaboristoj: Cirkulero. — Int. Transportlaborista Federacio: Komuniko por la Gazetaro. Int. Laboroficejo (Genevo): Informservo, Bulteno (aldono al 'E'). — Int. Cseh-Instituto de E (Den Haag): »Bulteno«, »Konversacia Gazeto« kaj de jan. 1932 la monata »La Praktiko«.

Kongresoj. Ekzistas tiom multaj kongresgazetoj, ke indas noti nur la plej valorajn: »Kongresa Gazeto« (4-a UK), »Revue de la Kongresoj kaj Pa-

roladoj», poste »Int. Revuo de la K. kaj P.« (ekspozicio en Bruselo 1910), »Kongresa Gazeto« (7-a UK), »Gazeto de la Dekaj Kongreso«, »Kongreso« (Unua Skandinava Kongreso 1918), »La XIII-a« (1921), »Boletín dei 2-a Congreso de E-istas Ibericas« (Bilbao 1924), »Kongresa Bultvno« (16-a UK), »La Gazeto de la XXIV-a«. La gazeto de kelkaj kongresoj estis aldonoj de »E«.

Diversaj gazetoj. Pri »Revuo Int.«, tiu valora kaj bela gazeto, kiu jam post la 5-a n-ro devis morti, oni legu detale en BIL. Sekvas »Revuo Universala«, »E-a Abel« (multaj karejoj kun tre diverspecaj temoj, ekz.: acorologio, friula popolo, urbriskriboj, komerco ktp.), »E-a Int. Revuo«, »Verda Stelo Int.«, »La Propagandisto«, »La Kroniko«, »Vekiĝo«, »Politika Malliberulo«, »Telegramo«, »Fundamento« (organo de »Parkurbo E« en München), »Variatea Mondo«, »Informilo« (Moskvo), »La E-isto« (organo de E-a Universitato Popola), »E Triumfonta«, kiu poste nomiĝis »Heroldo de E« (unu el la plej gravaj E-gazetoj) kun multaj aldonoj, »Nova Eŭropo« (Praha), »Nova Tagiĝo« (organo de la Int. Rondo E-ista ĉe la Sekr.-ejo de la Ligo de Nacioj), »E-io«, »Nova Tempo« (Vieno), »Por la Indigenoj«, »La Lumturo«, »La E-a Gazeto« (ĉiusemajna, Amsterdam), »Libero«, »Verda Stelo« (eld. de HDE), »La Inventisto« (blukopioj de elpensajoj), »USE-Eĥo«.

Numero de la E-gazetoj ĝis 1929 laŭ BIL estas 689; tiu ĉi nombro enhavas ankaŭ la tute negravajn, efemerajn gazetojn, sed ne la unuope aperintajn, neregulajn manskribitajn kaj similajn gazetojn aŭ foliojn.

Noto. Pri la iom gravaj gazetoj v. apartajn rubrikojn laŭ aboca vico. Krome 1. BIL, p: 305—354 kaj »Katalogo de la E-a Gazetaro« de Takács, revizita kaj kompletigita de Tarnow, (nun sub presado). P. TARNOW.

GEA: Germana E-Asocio. (v. Germanujo).

Geedziĝoj E-istaj. Inter samnaciaj E-istoj, plej ofte anoj de la sama E-grupo, okazas ofte geedzaj interligoj. Sed tio estas kutima maniero trovi geedzan paron, kio ne bezonas apartan esploron. Pli interesaj estas tiuj geedziĝoj, kiuj okazis inter diversnaciaj anoj pere de E, aŭ kiel sekvo de korespondado, aŭ kiel tiu de kongresa renkontiĝo. La »kolektadon« de tiuj E-istaj geedzoj komencis L. Kökeny, daŭrigis E. E. Yelland, per kies multaj klopodoj sube troviĝas informoj pri 56 geedzoj. Laŭ la ricevitaj respondoj la granda plimulto de la geedzoj uzas E-n kiel familian lingvon. Kelkaj problemoj postulas apartajn esplorojn, ekz. ĉu la infanoj lernas E-n kiel unuan lingvon kaj kiujn E-ajn vortojn ili kreas, kiajn »spontaneaj« estiĝantaj formojn uzas la geamantoj, ktp. E kiel »edzperanto« povas esti ankaŭ taŭga argumento pri la »praktika valoro« de E.

Edzo:	Edzino:	Jaro kaj loko de geedziĝo:
Andersson K. G. sveda	Aak Anastasia estona	? ?
Blaise Paul belga	Jones Margaret angla	1910, Liverpool
Blinov Eŭgeno rusa	Maitinsky Klara hungara	1931, Moskva
Chomette Charles usona	Van der Veken Germaine belga	1929, Antwerpen
Della Savia Giovanni itala	Mandel Blanka hungara	1927, Budapest
Ditrichstein Viktor hungara	Peyrard Juliette franca	1929, Lyon
Egg Alfred svisa	Wells Jennie angla	1922, Basel

Edzo :	Edzino :	Jaro kaj loko de geedziĝo :
Eriksson Henri sveda	Rubay Piroska hungara	1932, ?
Evstifeieff rusa	? hungara	? ?
Faulhaber Frits nederlanda	Čiškovská Evja ĉeĥa	1926, Amsterdam
Fransen W. nederlanda	Hitzler Christine germana	1931, Valkenswaard
Friis Lorenz dana	Cor Lignian nederlanda	1930, Amsterdam
Giesen Alois germana	Boijadjieva Sonja bulgara	1930, Rusĉuk
Golachowski A. pola	Kiere Albertine belga	1930, Lida (Pola)
Hague angla	Samson Paule franca	1933, ?
Haider Haver germana	Castellvi Palmira hispana	1926, Barcelona
Hamvai János hungara	Kurbatova Olga estona	1933, Budapest
Hansen Th. Knud dana	Gerisch Hildegard germana	1928, Auerbach
Huber Ferd. Peter aŭstria	Thomson Mary D. skota	1927, Habana, Kubo
Janson Martin B. E. sveda	Ungam Meta R. estona	1933, Tallinn
Jackson-Coleman Stanley angla	Schönau Muzza hungara	1926, London
Jakubek František ĉeĥa	Pirsts Milda latva	1932, ?
Jochmann Rudolf ĉeĥa	Spasova Dafinka, (†) bulgara	1929, Langenau
Kataszek Gustav K. pola	Laffield Gertie angla	1928, London
Kerr Kenneth C. skota	Tordoff Eliz ?	1915, Bradford
Kopeccky ?	Robinson Effie angla	? ?
Krestanov Ivan H. bulgara	? germana	? ?
Langlet Valdemar sveda	Blomberg Signe († 1921) finna	1899, Abo
«	Borovko Nina rusa	1925, Stockholm
Maier Wilhelm germana	Bevel Alice L. belga	1929, Frankfurt a. M.
Major József hungara	Sampson Cecilia angla	1926, Paris (eksedziĝis)
Malmkvist Artur sveda	Janson Ksenja estona	1933 (?), Ljugarn
Morariu Tiberio rumana	Anderson Lizzie sveda	1931, Stockholm
Moseley William angla	Ozols Elza latva	1930, London

Edzo :	Edizno :	Jaro kaj loko de geedziĝo :
Müller Trygve norvega	Mann Hertha germana	1926, New-York
Neyer Maurice belga	Kneisl Irma hungara	1932, Budapest
Nix John L. angla	Herix belga	? ?
Novosad Martin ĉeĥa	Laban Azraela germana	1933, ?
Parrish Donald E. usona	Gravè Poula E. dana	1912, Kopenhago
Petterson Folke sveda	Prostova Nina rusa	1932, Eskilstuna
Reim Kristoph Ferd. estona	Chlumsky Antonie ĉeĥa	1927, Tallinn
Rosner Robert germana	Mizzi Nejedly ĉeĥa	1926, Osseg (Ĉeĥ.)
Schäper Hans germana	Hewitson Mabel angla	1928, Blackburn
Staritsky D. rusa	Sevenhuysen N. holanda	1924, Holando
Strasser Robert germana (?)	Melis Maria Chr. holanda	1923, ?
Stromboli Alfred itala	Vandenkerckhove Maria belga	1912, Antwerpen
Taylor Frank V. angla	Hughes Adelaide E aŭstrala	1924, Kurri-Aŭstralia
Thilander Harald sveda	Järvanppä Varma finna	1928, Stocksund
Todd William angla	Hugai Julia hungara	1929, Gyöngyös
Tunón Karl sveda	Rammi Olga estona	1932, Holvandi
Vajda Viktor hungara	Salamon Klara aŭstra	1925, Roubaix (Franc.)
Virkkala Itmari finna	Anner Selma germana	1925, ?
Whittaker J. W. angla	Dehornois Raymonde franca	1932, Villeneuve
Witlin F. pola	Lapp L. franca	1933, ?
Yelland Ernest Edward angla	Sujadinoff Theresa rusa	1921, London
Zapaer Baldomero hispana	Chalmot Henriette (†) nederlanda	1910, Barcelona

E. E. YELLAND.

Geier (gajer) Peter K., aŭstro-germano. Vivis en Graz kaj mortis kiel soldato en 1914. En 1908 kunfondis en Graz int. klubon »Junaj E-istoj«.

Geiger Henrik, hungaro, komercisto. Nask. en 1892 en Budapest, mortis 20 okt. 1918. Red. kelkajn jarojn »H-landa Informilo«, »Verda

Radio«, kaj »H-lando«. Kelkaj originalaj poemoj, tradukadoj.

GEL: Germana E-o Ligo (en Ĉeĥoslovakujo).

Genève. Urbo en Svislando ĉe Lago Lemano, 131.500 loĝantoj. Sidloko de la Ligo de la Nacioj kaj aliaj gravaj int. institucioj, ankaŭ de UEA. — 2-a

UK 28 aŭg. — 2 sept. 1906, 818 partoprenantoj el 30 landoj; fondo de Konstanta Kongresa Komitato; deklaracio pri neutraleco de la E-kongresoj. — 17-a UK 2—7 aŭg. 1925, 953 kongresanoj el 35 landoj; prelegoj de la unua Somera Universitato; Z-a memorfesto.

Geoghegan (gĵahagan) Richard H., irlandano, stenografiisto pens. en Alasko. (Usono). Nask. 8 jan. 1866. Studis la filologion en Oxford, Anglujo, 1883—87, kie li estis univ. premiato en la ĉina lingvo. Servis en la fako de fremdaj aferoj de la japana registaro, 1893—1900; agis kiel brita konsulo en la ŝtato Washington, 1900—01; ŝtata stenografiisto en Alasko, 1902 kaj poste. La unua pioniro de E inter la angle parolantaj popoloj. Korespondis kun Z jam en nov. 1887 (N-ro 264 en la ZA). Lia unua korespondanto estis Grabowski, la dua Wahl, multe korespondis ankaŭ kun Einstein, Meyer, Libeks, Fredbärj, Bogdanov, Costa-e-Almeida, Cohen-Ganouna, Marignoni, Ostrovski, Kofman, Beaufront, Lemaire, Beauchemin, Phillips, Casal, Popov, Lengyel ktp. La unua, kun kiu li parolis E-e, estis Trompeter, kiu vizitis lin en Eastsound en la 1890-aj jaroj. Per brulego en 1904 li perdis ĉiujn leterojn ricevatajn de Z kaj aliaj amikoj de la pratagoj, samtempe pereis plena kolekto de ĉiu libro kaj gazeto en kaj pri E aperinta ĝis tiu epoko. Ĝis la nuna momento li konservas aktivan intereson por E kaj ĝin propagandas. Tradukoj: Dr E-s Int. Language (Bibl. de LIE N-ro 5. 1889); Complete Instruction Book (1895 kaj 1889); New Words on the Int. Language (Bibl. N-ro 98).

Geometrio Absoluta. Verkis C. Vörös, eld. Kókai. La titoloj de la tri volumoj: elemento de la GA., 1911, 106 p.; Analitika G. A., unua parto, La Ebena Bolyai-a, 1910, 134 p.; Analitika G. A., dua parto, La Spaco Bolyai-a, 1912, 200 p. Gravaj sciencaj verkoj, tre kuraje aperigitaj.

Georgo Dandin. Komedio de Molière, el la franca trad. Z. 1908, 51 p., dua eld. 1924. »En kelkaj lokoj, spertulo en lingvaj demandoj penus

alimaniere E-igi pensnancojn, sed ĝenerale oni devas konfesi ke Z tradukis precize kaj ĉefe ĉiam tre kompreneble.« (G. S., E', 1924, p: 124.)

Georgov Ivan A., bulgaro, d-ro, univ. prof. de filozofio. En 1906 prezentis al la B. publiko la taskon de la Delegacio, verkis artikolon. Poste estis influita de la idista movado.

Germana Esperanto-Centro v. Friedrich Eliersiek G. m. b. H.

Germana E-isto. Kvankam La E-isto (Nürnberg) en siaj unuaj tri n-roj (sept.—dec. 1889) kaj Der Deutsche E-ist (aldono al Revuo Int. en Bystrice-Hostyn, nov. 1902—jan. 1903) enhavis germanlingvajn partojn, tamen la unua prop. gazeto por Germanujo estis GE, la sola E-a gazeto el tiuj fruaj tempoj, kiu ĝis hodiaŭ tute regule aperas. GE devenis el la pure propagandaj »E-istische Mitteilungen, E-aj Sciigoj, Organ der E-isten Gruppe Berlin« red. Jean Borel, eld. kaj presejo Möller & Borel, Berlin, entute 10 n-roj, de febr.—dec. 1904 kun 56 p. 24×16. En jan. 1905 la titolo ŝanĝiĝis en »GE, E-aj sciigoj por germanlingvanoj«, kaj de nun ĝi ankaŭ enhavis kelkajn lit. paĝojn. De jan. 1907 GE fariĝis oficiala organo de GES (de junio 1909 GEA). Ĝis julio 1914 kaj de jan. 1921—dec. 1926 ĝi havis specialan, parte bele kolorigitan kovrilon.

Red. 1905—junio 1907 Jean Borel, julio 1907—sept. 1908 d-ro Liesche, okt. 1908—apr. 1910 Jean Borel, majo 1910—okt. 1914 Eliersiek ĉiuj en Berlin, okt. 1914—marto 1922 F. kaj H. Ader en Dresden, apr. 1922—sept. 1923 Eliersiek, okt. 1923—dec. 1926 A. Behrendt, jan. 1927—dec. 1929 A. Schwarz, de jan. 1930—hodiaŭ G. Habellok.

Ĉar la legantaro kreskis kaj la loko disponebla en GE ne permesis enmeti multan literaturon, oni aldonis de jan. 1907 specialan lit. aldonon **Liberaj Horoj** kun tekstoj, kiuj konvenis por E-aj kursoj. De jan. 1910 L. H. devis ĉesi kiel speciala aldono kaj fariĝis parto en GE. Sed jam en jan. 1911 L. H. estis memstarigita sub la titolo **La Instruanto**, kiu enhavis precipe interesan materialon por kursoj. Dum 1911 la abonantaro de GE

multe kreskis, samtempe oni havis la deziron tute forpreni la literaturon el ĝi. Do oni kreis ekde jan. 1912 du eldonojn de GE: eld. A kiel propagandan kaj eld. B (kiu samtempe enprenis »La Instruanto«-n) kiel literaturan. Pro la malfacilaĵoj dum la mondmilito oni ĉesigis tiun praktikan kaj bonan aranĝon kaj de jan. 1920 aperis de oxe nur unu sola eldono. De okt.—nov. 1923—dec. 1926 kaj de jan. 1932 estis akceptata kiel parto de GE E-Praktiko v.

Nombro de paĝoj de 1905 ĝis fino de 1932: 6796. P. TARNOW.

Germanujo. Oni povas konstati kelkajn epokojn en la evoluo de la E-movado. Ĝis 1906 agado de unuopuloj kaj malmultaj grupoj; 1906—08 ekago de GES (nun: GEA); 1908—14 rapida kreskado de la movado; 1914—24 batalo pri vivo 1924—33 rekonstruo, iom-post-ioma refortigo, sed formiĝo de diversaj asocioj; komence de 1933 la nova ŝtata ordo influas la E-movadon tre senteble, eĉ tiel ke oni rajtas paroli pri ĝia novorganizo, ankoraŭ ne finita.

En marto 1906 Fritz Schuck, Braunschweig, aperigis broŝuron »Albumo de konataj E-istoj.« Pri E en Germanujo la eldoninto skribis jenon:

»En Germanujon E longtempe ne povis penetri, malgraŭ la malnovaj amikoj Einstein, Trompeter kaj Meyer. Ili laboris energie jam de la komenco (1888). La nurnberga verkisto Einstein fondis la »E-klubon« kaj eldonis lernolibron kaj broŝuron, sed tro frue la morto forprenis lin (1890). Trompeter, termezuristo en Schalke, subtenis nin en malfacilaj tagoj. Sen lia helpo nia lingvo eble ne plu ekzistus. Li mortis en 1901. Malsano malhelpis lin jam en 1898 plie labori por E. Meier, München, aŭtoro de lernolibro, provis daŭrigi la laboron, sed li ne havis sufiĉe da kunhelpantoj. La vera iniciatoro de l' nuna stato de E en Germanujo estas Jean Borel en Berlino. Li donis al ni la unuajn batalilojn, la unuan gazeton kaj la provizoran centron por komuna laboro per fondo de l' Berlina grupo kaj de l' E-eldonejo. Post malfacila komenco li trovis bonaĵn kunhelpant-

ojn. Prof. d-ro Schmidt en Potsdam E-isto de 1898, fariĝis prez. de l' grupo kaj laboras per paroladoj, per propra influo ktp. Ni prezentas ankoraŭ d-ron Mybs, prof. Christaller kaj d-ron Ebner ĉiuj konataj gvidantoj de l' germanaj grupoj Specialan citon meritas la frankfurtanoj. D-ro Hanauer kaj Barthel senlace laboras, subtenataj de multaj fervoraj amikoj, inter ili Kuchler, Götz, Simon. Wallon, nun en Breslau, estas unu el la fondintoj de l' grupo de Braunschweig. Li laboris ĉiam fervore kaj estas nun honora membro de l' grupo.«

Kiam en 1931 GEA festis sian 25-jaran fondiĝon, Jean Borel rememoris pri la epoko, el kiu naskiĝis GEA, i. a. en la sekvaj vicoj:

»Unuafoje mi parolis pri eventuala grupigo de la germanaj E-istoj je la Pentekosta sabato de 1903 kun d-ro Zen Varsovio. Neniam mi forgesos la ĉarmajn horojn pasigitajn kun nia Majstro, — tiun tagon en lia tiama loĝejo, strato Dzika, kaj la sekvantan dimanĉon, kun lia familio en kampa domo en la ĉirkaŭaĵo de l' urbo.

D-ro Z unue interesiĝis pri nia Svisa E-Societo, fondita la antaŭan jaron de mia amiko Renard kaj de mi, kun monata jurnaleto »Svisa Espero«, kiun ni kune redaktis kaj pri kies stilo kaj enhavo Z bonvolis gratuli.

Ni parolis pri la SFPE, kiu jam ekzistis sub la aŭtokrata gvidado de Markizo de Beaufront. Li havis la tutan francan movadon en sia mano kaj Z estis doninta al li kvazaŭan monopolon por la plua vastigado de E.

En Anglujo nacia movado komenciĝis kaj Ruslando jam de longe havis multajn fervorajn samideanojn, sed sen registara permeso, grupiĝi en nacia societo.

Dume, en Germanujo, malgraŭ la laŭdindaj penadoj de ekskaptiano Ludwig Emil Meier en München, por krei nacian kunligon, nenio moviĝis. La fiasko de Volapük estis ankoraŭ tro freŝa en ĉies memoro. Pro tio Meier diris al mi, kiam mi vizitis lin, ke estos eĉ malpli facile, iniciati movadon en Berlin.

Laŭ kelka vidpunkto li estis prava,

sed tia ne estis la opinio de Z. Li konsilis krei en la ĉefurbo unue malgrandan centron, el kiu povus eiri pli vasta propagando en la tutan landon kaj por tio grupeto de la tie ekzistantaj malmultaj E-istoj aŭ pli vere amikoj de E-sufiĉos, kondiĉe, ke oni laboru energie kaj antaŭ ĉio havu la necesajn propagandilojn, kiuj tute mankis. Li proponis sian kunlaboradon por la pretigado de lernolibro kaj de du vortaroj: Germana-E-a kaj E-a-Germana. Nur tiam, kiam oni havos taŭgan, fidindan materialon, oni povos fari utilan laboron kaj pensi pri kreo de nacia societo. Por starigi armeon, oni bezonas soldatojn kaj batalilojn. Jen la unua tasko. Ĝi estis sufiĉe grava kaj nefacila, precipe pro manko de la laborfortoj, kiuj venis al ni nur iom post iom kaj malrapide.

En fino de 1903 ni fondis E-grupon en Berlin, el kiu eliris la movado tra tuta G. dum la firmo Möller & Borel estis pretiginta la plej ŝanĝajn materialojn: propagandiloj, klarigaj folioj, libretoj por memlernado, ĉar tiam neniu povis instrui la lingvon.

Dum 1904 jam venis al ni kelkaj entuziasmaj homoj el diversaj partoj de G. kaj Aŭstrujo, sed precipe dum 1905 kreskis la nombro de personoj, kapablaj propagandi kaj instrui, kaj tiam oni povis pensi serioze pri organizo de nacia societo tutgermana.

Okazis inter germanlingvanoj interŝanĝo de opinioj en la UK 1905. Laŭ mia peto d-ro Mybs, Altona, prezidis nian kunveneton, kiu okazis en la teatro, sed li ankoraŭ ne parolis flue, kaj ni interparolis germane.

Estis ankoraŭ tro frue, por fari ian nacian organizaĵon, sed oni decidis labori energie dum la vintro kaj vidi, ĉu estos eble komenci serioze la sekvantan printempon.

Efektive, post ok monatoj okazis en Braunschweig la ĝenerala kunveno de germanaj samideanoj el kiu eliris Germana E-Societo. D-ro Mybs fariĝis prez., d-ro Hanauer sek. Mi mem rifuzis, akcepti ian oficon en la komitato pro personaj kaj sanecaj motivoj, sed mi gardis la redaktadon de Germana E-isto, kiu fariĝis oficiala organo.

Jean Borel devas esti nomata kre-

into de E-movado en G. En febr. 1904 unufoje aperis la organo de la E-grupo Berlin; ĝia titolo estis »E-istische Mitteilungen« (E-istaj Informoj); red. estis J. Borel, kiu eldonis ankaŭ varbfoliojn, informilojn kaj lernolibron, kiu eĉ nuntempe estas tre ŝatata. Jam en la jul.-aŭg. n-ro de »Informoj« la redaktoro povis konstati, ke »G., kiu ĝis nun skeptike staris flanke for de la movado, komencas serioze interesiĝi por la afero.« Grupoj en Berlin, Braunschweig, Glatz, Hamburg-Altona, München estis citataj, krome izoluloj en Gotha, Gross-Schönau i. Sa., Jena, Karlsruhe, Königsberg Pr., Leipzig, Lindau Harz, Marienwerder Westpr., Pforzheim, Stuttgart, Strassburg.

La sekva n-ro de »Informoj« enhavis vokon de la grupo Berlin por opiniesprimoj pri »fondo de centra kunigo de la germana E-istaro«. Ĉi tiu voko ankaŭ okupiĝis pri centra gazeto germana. La sama n-ro informis pri naskiĝo de grupo en Frankfurt a. M.; jen la sesa germana E-grupo! Oni opiniis la fondon de ia organizaĵo tro frua, sed la firmo »Möller und Borel« informas, ke de jan. 1905 la germanaj E-istoj havas sian komunan gazeton: el la »Mitteilungen« fariĝis »Der Deutsche E-ist«, la Germana E-isto. Ankaŭ en tiu jaro fondiĝis novaj grupoj: en Karlsruhe, Neu-Isenburg, Stuttgart, Göppingen i. Württ., Plauen, Dresden, Breslau, Jena. Naskiĝis la unua laborista grupo en Frankfurt a. M. Izoluloj en multaj lokoj entuziasme varblaboris.

Braunschweig estis la urbo de la unua iom grava kunveno de germanaj E-istoj (1 aŭg. 1905) kaj ĝi estis la sidloko de la 1-a germana E-kongreso - 19 kaj 20 majo 1906. La kongreso, prezidata de d-ro Mybs, estis sukcesa, la unuan tagon oni fondis »Deutschsprachige E-isten-Gesellschaft« (Germanlingva E-ista Societo). La sola celo de la GES laŭ la statuto estas diskonigo de la int. helplingvo E laŭ la Fund. de E kaj laŭ la Deklaracio de Boulogne. La statuto fiksas i. a., ke ekzistu apud la estraro (oni nomis ĝin: centra aga komitato) aparta komitato (konsilantaro), al kiu apartenu minimume 20 konataj E-istoj

el G., Aŭstrujo kaj Svisujo. La oficiala gazeto de GES fariĝis Germana E-isto kaj la estraron formis d-ro Mybs, prez., d-ro Hanauer Frankfurt a. M. kaj Fr. Schuck, Braunschweig. Pro praktikaj kaŭzoj oni leĝe registris la societon sub la nomo «Deutsche E-isten-Gesellschaft» (Germana E-ista Societo).

La 2-a germana E-kongreso (8—12 majo 1907) efektive jam elmontris la forton de la E-movado kaj vivigis grandan esperon, kies plenumiĝo estis la fakto, ke la 4-a UK okazis en Dresden. Eklaboris la »Kvaro por la Kvara«: d-ro Mybs, d-ro Schramm, s-ino Hankel, d-ro Arnholt. La UK fariĝis granda sukceso. »Ifigenio« de Goethe, trad. de Z kaj prezentita de geaktoroj el Berlin, entuziasmigis la int. publikon. La praktika sukceso el ĉi tiuj tagoj estis la fondo de la Saksa E-Instituto, kiu poste transformiĝis E-Instituto de la tuta lando.

Ankaŭ la jaro 1908 alportis por GEA batalon tiel interne de G. pro organizo, kiel ekstere pro la helplingvo mem. Fondiĝis »Verband Deutscher E-isten« (Ligo de Germanaj E-istoj), kies agmaniero minacis malutili al la reputacio de GES. Krome la reformemo minacis malhelpi la daŭran kaj trankvilan progreson de la E-movado. La duobla batalo kaŭzis perdojn al GES, sed la rezultoj el pli ol du jardekoj ne plu povis esti neniigitaj. La naskiĝinta (same 1908 en Dresden) UEA trovis inter la membroj de GES multajn anojn kaj apogon flanke de GES mem, kiom estis eble konsidere al la diversaj celoj de la du organizajzoj.

Kiam la prez. de GES kunvokis la membrojn por la 3-a germana kongreso 21—23 majo 1909 en Gotha, li skribis la taskon de la estonta laboro jene: »Nia organizaĵo devas esti kunordigata kun tiu de la UEA, la bazo, sur kiu ni daŭrigu nian laboron, estas speciala agnosko de ĉi tiuj du granda faktoroj kiel oficialaj reprezentantoj de la E-movado en la en- kaj eksterlando.« Rezulto el la konsideroj kaj diskutoj de ĉi tiu kongreso estis kompleta novordigo en la organizo de GES. Ankaŭ la estraro ŝanĝiĝis, prez. fariĝis Mybs, Hamburgo, vicprez. d-ro

Möbusz, Lübeck, trezoristo kaj afergvidanto d-ro Kandt, Bromberg; prez. de la konsilantaro patentadvokato Schiff, Berlin; prez. de la ekzamenkomisiono R. de Ladevèze, Hamburgo. Laŭjure sidejo restis Berlin, kaj el la nomo GES fariĝis GEA (asocio).

Jam en ĉi tiu epoko rimarkiĝis E-istaj laboristoj, kiuj kelkloke ne harmoniis kun la t. n. burĝa asocio. Speciale notindaj konfliktoj ankoraŭ ne naskiĝis, sed la sekvintaj jaroj montris plifortiĝon de la E-movado inter laboristoj, kiuj proklamis E-n ilo por siaj celoj.

La germanaj E-istoj, kunvenintaj en Augsburg (1910) povis ĝoje konstati, ke la reorganizita GEA bone funkcias; ĝi kapablis, por la kongreso en Lübeck (1911) aperigi la 1-an volumon de serio da publikajoj sub la titolo »Das E ein Kulturfaktor«, kiu prilaboris d-ro Möbusz. La 2-a volumo aperis por la kongreso en Danzig, 1912, prilaborita de d-ro Ledermann, Augsburg; la 3-a aperis por la kongreso en Stuttgart 1913 (de prof. Christaller) kaj la 4-a por Leipzig 1914 (de pastro Lösche el Wurzen). En Danzig oni elektis novan estraron, prez. Reinking, Braunschweig, vicprez. prof. Christaller, Stuttgart, afergvidanto von Frenckell, Dresden, trezoristo d-ro Arnholt.

En tiu epoko GEA havis 179 lokajn grupojn kaj entute 4260 membrojn. Kvankam montriĝis ioma malkresko ekde 1910, ĉi tiu fakto tamen ne pravas malkreskon de la E-movado, ĉar fakaj ligoj kaj la intertempe (1911) formita »Arbeiter E-Bund« (Laborista E-Asocio) tiris al si nove varbitajn E-anojn kaj ĝistiamajn membrojn de GEA. Oni povas diri, ke la E-movado en G. tiutempe estis rimarkinde forta kaj vigla. Krome estas fakto, ke ĝuste en la epoko 1909—14 la germanlingvaj E-anoj prezentis konsiderinde grandan nombron en la membraro de fakaj int. ligoj. Ekz. la Int. Ligo de E-istaj Poŝtkaj Telegraficistoj fondita de Schmidt Dresden kaj gvidata de 1911 de Behrendt, havis en la somero 1914 pli ol 500 membrojn, inter kiuj la plimulto estis germanlingvaj; ĉi tiuj membroj plejparte apartenis nur al la faka ligo.

ne ankaŭ al GEA. Simile estis rilate al kuracistoj, juristoj, bankistoj, ktp. Oni certe ne tro taksas, indikante por 1914 la ie organizitajn germanlingvajjn E-anojn per la cifero 8000.

Dum la milito la germanaj E-istoj same kiel tiuj el aliaj nacioj utiligis E-n por la informado al la tuta mondo favore al G. Servis pere de E al sia lando Ellersiek, Markau, Reber, Behrendt. Ankaŭ E-istoj el Leipzig kaj Dresden instruistoj Wilhelm, Rössel kaj Bennemann tradukis kaj dissendis la militraportojn en la neŭtralan eksterlandon; kolektis ĵurnalojn el la antant-ŝtatoj kaj transdonis ilin al la registaro. D-ro Albert Steche, saksa industriisto, en la parlamento pledis por E kaj sekve la registaro finace ebligis la cititajn laborojn. Okaze de la Ruhr-invado en 1923 Behrendt eldonis samcelan bultenon pri la politika situacio.

Ankaŭ GEA ne pereis pro la milito, kaj la ĉefan meriton havas en tio d-ro Steche, kiu provizore anstataŭis la prez. Reinking, kiu militservis. Du kunvenoj pruvis la forton de GEA: dec. 1916 en Dresden kaj apr. 1918 en Leipzig. Specialan apogon donis la Rejna Vestfalia E-Ligo, (REVELO), kiu prezidis Fr. Pillath, Essen.

Fine de 1919 GEA estis parte rekonstruita, havinte 49 grupojn kaj entute iom pli ol 1000 membrojn. Kunveno en Eisenach (majo 1920) elektis kiel prez. d-ron Steche, d-ro Arnhold fariĝis afergvidanto kaj trezoristo, von Frenckell prez. de P'konsilantaro. La 10-a kongreso de GEA en Essen (majo 1921) kompletigis la estraron: d-ro Vogt, Stuttgart, fariĝis vicprez. La membraro ampleksis 127 grupojn kaj entute 2300 membrojn. Ĉi tiu kongreso speciale distingigis per parolajo de d-ro Steche, multe preparolita de la ĵurnalaro: »E — nacia postulo.« Rajte d-ro Steche povis deklari en sia saluto por la nova jaro 1922, ke »GEA finis la epokon de rekonstruiĝo.« Kunvenoj de distriktaj ligoj, apartenantaj al GEA, estis pruvintaj, ke GEA rae fortiĝis.

Sed venis la inflacio en 1923 kaj ŝajnis, ke ĉi tiu mizero mortigos la E-movadon en G. Denove la gvidanto d-ro Steche kun helpantoj (Junker kaj

Brakel, Köln; Ranft, Dresden kaj aliaj) saĝe kaj prudente sciis venki la danĝeron kaj bonkonscie kapablis promesi novan rekonstruon okaze de la kunveno en Nürnberg, interne de la 15-a UK 1923. La esperon pri nova fortiĝo pravigis la sinteno de grandaj E-eldonejoj: Hirt und Sohn, Leipzig; Ellersiek kaj Borel, Berlin; Jung, Horrem apud Köln, kiuj ne perdis kuraĝon kaj fidon.

En ĉiuj mizeroj de GEA estis kaj restis ĝia forta helpo kaj apogilo la asocia gazeto Germana E-isto, kies eldonanta fimo ofte ŝanĝiĝis: Möller und Borel; Ader und Borel, Dresden, Ellersiek und Borel; R. Mosse, kaj fine Fr. Ellersiek. La plej grandan meriton havas la nuna eldonanto, Ellersiek, kiu savis la gazeton spite al ĉiu inflacia danĝero.

La plifortiĝo de la ĝenerala movado kaj sekve ankaŭ de tiu e. G. multe helpis E Triumfonta (nuntempe: Heroldo de Esperanto), eld. de Teo Jung, komence en Horrem, poste en Köln, ekde 1919 kiel semajna gazeto (kelktempe eĉ kiel duonsemajna). HDE vivas nun sian 15-an, sed Germana E-isto jam sian 31-an jaron, ĝi estas la dua E-ista gazeto laŭaĝe.

Kelkaj indikoj atestas la forton de la E-movado en G. En fino de 1923 GEA havis 184 lokajn grupojn, 12 distriktajn ligojn aŭ unuigojn. Ekzistis laborokomuno en Baden, ligo en Saarteritorio, ligo en Danzig, Laborista E-Asocio (85 lokaj grupoj) kun aparta gazeto; fakunuigoj de instruistoj, komercistoj, fervojaj oficistoj, policistoj k. a., Germana Scienca E-Societo, Unuigo de Junuloj, Katolika E-Ligo, Kristana E-Ligo. Okazis en 1923 la 15-a UK kaj int. katolika E-kongreso, ambaŭ en Nürnberg, krome kongreso de SAT en Cassel. La E-Instituto por la Germana Respubliko havis 26 ekzamenkomisionojn, konfirmatajn de la registaro. Speciale menciinda estas la fakto, ke laŭ la statistiko dum 1922 en 126 lernejoj 172 instruistoj instruis E-n al pli ol 7000 lernejoj. »Komerca Revuo« eld. de KEU, Dresden, klopodis sukcese serviĝi E-n por komercaj celoj. Vigla laboro ĉiea vekis novan esperon. Tamen la sekvintaj kongresoj devis precipe organizi, rekonstrui: 1924 en

Plauen, 1925 Magdeburg. La oficejo de GEA translokiita en 1924 al Nürnberg (Max Hönigsberger kaj Otto Pilloher), reiris fine de 1925 al Berlin (Al. Schwarz). En Magdeburg oni elektis novan estraron: d-ro Kliemke prez. d-ro Vogt, Stuttgart, unua, L. Gube, Berlin, dua vicprez., d-ro Eberler Berlin, trezoristo, Al. Schwarz, Berlin, afergvidanto. En la Berlin-a oficejo eklaboris kiel sekretario Georg Habelok.

La malferma kunsido de la kongreso en Magdeburg estis disaŭdigata per radio. Je la unua fojo radio kaj E solene kuniĝis. En siaj salutvortoj Behrendt, Berlin, profetis la estiĝon de kvazaŭ universala universitato per helpo de la du faktoroj: E kaj radio.

Ankaŭ por la Magdeburga kongreso aperis la 5-a volumo de »Das Ein Kulturfaktor«, prilaborita de studkonsilisto d-ro Trögel, Auerbach. La 6-a volumo aperis en 1926 de studprof. Schmalz, Weiden, la 7-a en 1927 de instr. Dahmen, Horrem, la 8-a en 1928 de Al. Schwartz, kiu enhavis ankaŭ festparolajon de d-ro Trögel »Individuo — Nacio — Homaro«.

En 1925 oni disdonis je la unua fojo la jus fonditan honoran insignon de GEA al du pioniroj, nome al d-ro Steche kaj d-ro Arnhold. En la sekvantaj jaroj la insigno estis donata al jenaj same honorindaj personoj: Jean Borel, San Remo, prof. Christanell, Stuttgart, d-ro Möbusz, Lübeck (1926); Marie Hankel, Dresden, prof. d-ro Schmidt, Potsdam, eklezia konsilisto Becker, Breslau (1927); prof. d-ro Dietterle, Leipzig (1929); von Frenckell, Dresden, Hahn, Gohlis (1930); d-ro Vogt, Stuttgart, Käthe Jahns, Braunschweig, Felix Epstein, Bünemann, Hamburg (1931).

La 15-a germana kongreso okazis en München 1926. La kunvenintoj povis konstati, ke nun GEA denove staras sur fortika bazo; helpis la multaj kursoj dissenditaj tiutempe pere de radio. La 16-a okazis en Köln 1927, la 17-a en Potsdam 1928, kiam rimarkigis la parolajo de d-ro Vogt »Organizo kaj propagando en E-ujø«, kiu montris la necescon de unueca E-movado. La 18-a kongreso estis aranĝita en Frankfurt a. M. 1929, kiam oni

elektis ankaŭ novan estraron. Prez. fariĝis Behrendt, Berlin, d-ro Vogt unua, kaj instr. Markau dua vicprez., trezoristo restis d-ro Eberler, afergvidanto A. Schwarz, kiun en fino de 1929 anstataŭis la ĝistia GEA-sekr. Georg Habelok, kiu nun prenis sur sin duoblan laboron.

La E-movado mem en G. jam havis tian amplekson, ke ne plu estis eble, registri ĉiujn kursojn, parolajon por varbado, ekspoziciojn, kunvenojn, ĉiuspecajn aranĝojn. Laborista E-Asocio havis fine de 1927 ĉ. 3000 membrojn en 120 grupoj. GEA prezentis 135 grupojn; krome konataj estis ĉ. 100 grupoj ne organizitaj; E-unuigo de germanaj instruistoj havis 300, E-ligo por blinduloj 116 membrojn. Ekzistis aliaj unuigoj, kiuj ne apartenis al GEA kiu jam delonge ne plu estis la sola kuniĝo de E-istoj sur germanlingva teritorio. Moko kaj rido pri E estis maloftaj, kvankam kontraŭdiroj ne tute silentis.

Post la 19-a germana E-kongreso en Dresden 1930, la 20-a en Hamburg 1931 fariĝis la unua jubilea kongreso de la germana E-istaro: GEA nun vivis 25 jarojn. En fino de 1930 GEA havis 123 grupojn kaj entute 2371 membrojn; samdate Laborista E-Asocio ampleksis 228 grupojn kun 3887 membroj. Jam por 1928 la statistiko, prilaborita de E-Instituto por la Germana Respubliko, konstatis en G. 441 grupojn kun 8490 membroj E jam fariĝis publika afero, ne plu vegetis en kluboj.

Estas notinde, ke krom en Saksujo, en Berlin okazis E-kursoj por lernejanaj: komence de la vintra duonjaro 1930—31 ĉ. 900 lernejanaj en 22 popollernejoj estis instruataj. Sed la ekonomia situacio pli kaj pli premis ankaŭ la anaron de GEA, kaj nemirige, ke la 21-a germana kongreso en Chemnitz 1932 ne montris tre grandnomban ĉeestantaron; tamen ĝi pasis kontentige spite al multaj malfacilaĵoj kaj distingigis per la festparolajo de d-ro Kraner, Dresden, pri »Gojo pri E«. Jam en Hamburg 1932 la kongresprogramo enhavis specialan parolajon kun sekvanta diskuto, ambaŭ en E. En Chemnitz parolis d-ro Wicke, Chemnitz, pri »E kaj nacio«, krome Hahn,

Gohlis, pri »Praktika E-laboro en lernejo kaj grupo.«

Spite al la ekonomia mizero fine de 1932 GEA havis 125 grupojn kaj entute ĉ. 2370 membrojn, propran oficejon, gazeton; krome GEA eldonis specialajn informilojn por la ĵurnalaro. Samdate Laborista E-Asocio ampleksis 230 grupojn kun ĉ. 4000 membroj; ankaŭ ĝi eldonis sian propran gazeton. Ekzistis ankaŭ Socialista E-Asocio por la germanlingva teritorio kun ĉ. 1450 membroj kaj gazeto.

Kromĉe notindaj: E-Unuiĝo de germanaj instruistoj, Leipzig (550 membroj); E-Unuiĝo de saksaj instruistoj, Gohlis apud Dresden (417 membroj); Tutmonda Asocio de Geinstruistoj E-istaj, Leipzig, Germana E-Unuiĝo de Blinduloj, Breslau (120 membroj); Universala Unuiĝo de Blinduloj E-istaj, Köln-Ehrenfeld (400 membroj); Katolika E-Ligo Ludwigshafen.

Por la fako E kaj radio sukcese laboris kaj laboradas Jungfer, Lübben kaj helpantoj, tiel ke la plimulto de la germanaj sendstacioj estis E-emaj ĝis 1933. Fakaj ligoj de juristoj, scienculoj, fervojistoj, policianoj, komercistoj laboris por kaj per E, fojroj utiligis E-n pli kaj pli amplekse. Ministerioj rekomendis la studon de E. Unuvorte: la E-movado sur germanlingva teritorio kontentige statis kaj prosperis.

30 jan. 1933 ekregis la naciŝocialista partio. Ŝanĝiĝis la tuta publika vivo elfunde; malaperis marksismo kaj ĉio simila, malaperis ankaŭ ĉiu unuiĝo de E-istoj, kiu iel kontraŭstaris al la nun reganta partio. GEA restis, sed submetiĝis al la principoj, kiuj ekregis kaj postulis novan ordigon en la organizacio. GEA akceptis en Köln aŭg. 1933, okaze de la 25-a UK, la novan ordigon; provizora gvidanto de GEA fariĝis Behrendt; membroj estas la unuopaj E-istoj, ne plu grupoj; ili devas adaptiĝi al la gvidreguloj de la germana registaro. Celo de GEA fariĝis »diskonigo kaj utiligo« de E. Sekve germanaj E-istoj tuj ekklopodis ankaŭ per E diskonigi informojn pri la situacio en G., ktp. En 1933 la germana nacio ree konsciigis pri si mem: unue la necesoj de la propra nacio, poste la int. bezonoj! Jen principo, de-

tendita de la GEA-gvidanto jam antaŭ dudeko da jaroj, en la jenaj frazoj: »E kapablas multon atribui por plifortigi la german-nacian konscion, por plintensigi konon kaj komprenon de la germana lingvo, por plifortigi la germanecon en la eksterlando, por peri komprenon kaj estimon pri germana maniero.« (»Ĉirkaŭ la Mondo«, 1913, n-ro 2.).

GEA partoprenas laŭ povo en informa laboro. La gazeto Germana E-isto estas utiligata por tiu ĉi celo. GEA mem klopodas anigi al si ĉiujn germanajn E-istojn, ĝis nun organizitajn en fakaj unuiĝoj k. s., sed ĝi malakceptas ĉiun, kiu ne senrezerve submetiĝas al la nuna ŝtata reĝimo. La nuna membraro de GEA sumiĝas je 2200. La nombro estas despli konsiderinda, ju pli multaj judoj ne ree anigiĝis.

Antaŭ neioŝe fondiĝis »Neue Deutsche E-Bewegung« (Nova Germana E-Movado), kiu konsistu — laŭ la statuto — nur el anoj de la arja raso; nuna amplekso ne estas konstatebla. Se ĉi tiu nova movado, kiu cetero havas la saman celon kiel GEA, trovas la aprobon, apogon kaj oficialan helpon de la registaro, GEA devus malfondiĝi; ĝi malfondus sin mem, ĉar tiam la atingita oficialeco malnecesigus ĉiun asocion. Intertempe GEA datrigos sian laboron por E kaj por G. per E.

Instituto. La unua gvidanto de la Saksa E-Instituto estis d-ro Albert Schramm. Laŭ dekreto de la tiama reĝa saksa ministerio por internaj aferoj (12 nov. 1908, n-ro 1610 III. F.), la Instituto estis metata sub la aŭtoritato de ĉi tiu ministerio, sekve ĝi fariĝis (duon)oficiala institucio. Dum la unuaj jaroj la Instituto direktis sian agadon speciale al la diskonigo de E, instruante kaj helpante laŭ povo ĉi-tiurilate. Jam en 1909 d-ro Schramm aranĝis oficialajn ekzamenojn ĉe la Instituto, kies kroma agado koncernis la tradukon de prospektoj kaj korespondadoj de firmoj, fojroj ktp. Schramm entreprenis multajn prop. vojaĝojn, verkis artikolojn por ĵurnaloj kaj fakaj gazetoj kaj per tio tre multe atribuis al la bonfamo de l' Instituto kaj la disvastigo de la E-movado. Ĝis 1913 la Instituto loĝis en Dresden, de

ĉi tiu jaro en Leipzig. De 1914 la gvidanto de la Instituto fariĝis prof. d-ro Johannes Dietterle. Kiam la milito eksplodis, la laboroj estis daŭrigataj de la Leipzig-a Ligo de E-aj grupoj, ĉar Dietterle kaj ankaŭ la ĝis-tiama sekr., instr. Hahn soldatiĝis. En komenco de 1916 Dietterle estis oficiale instalata kiel direktoro, kiu prenis sur sin ankaŭ la administradon de la ŝtata saksa E-biblioteko kun ĉ. 1200 volumoj.

Unu el la plej gravaj taskoj de la Instituto fariĝis la zorgo pri fidinda statistika materialo el la E-movado ne nur en G., sed ankaŭ en la ŭta mondo: sekve la Instituto akiris int. gravecon. Konsekvenco de tia agado montriĝis per tio, ke la ministerio por internaj aferoj de la respubliko konsentis, nomi la Instituton E-Instituto por la Germana Respubliko, aprobis ĝian regularon kaj metis la Instituton sub la zorgon de la sekcio III en la ministerio per dekreto de l' 4-a de aprilo 1923, III 2741. La Instituto fariĝis ankaŭ modelo por la fondo de similaj institutoj en eksterlando.

GEA rezignis jam en 1922 pri la aranĝo de ekzamenoj, por ke la instituto povu starigi unuecan sistemon por ekzamenoj. Ampleksan laboron plenumis la Instituto sub la gvido de Dietterle kune kun siaj ekzamenkomisionoj, dislokitaj en G. dum 1927-32. Ne malpli ol 435 ekzamenoj estas faritaj dum tiuj jaroj kun sukceso. Inter ili la simpla »ekzameno pri kapableco« estas plej multe reprezentata (251); ĝi donas laŭ la ekzameno-regulato »ateston pri la kapableco, E-e primi siajn pensojn en simplaj parolado kaj korespondado.« La iom malpli facila »ekzameno por kursgvidantoj« estas farita de 77 personoj, la »ekzameno pri scienca pedagogia kapableco« por personoj, kiuj intencas instrui E-n en lernejoj, de 102 personoj, la »ekzameno pri scienca kapableco« por personoj, kiuj deziras havi »ateston, ke ili fundamente estas pritraktintaj E-n kaj la E-movadon de sur scienca bazo, kaj ke ili scipovas diskuti sciencajn demandojn en E« de 5 personoj.

1 okt. 1932 d-ro Friedrich Schreiber anstataŭis d-ron Dietterle kaj gvi-

dis la Instituton ĝis la 31-a de marto 1933; de tiu dato d-ro Albert Steche plenumas la gvidlaboron. La sekr. de la Instituto de 1918 estas f-ino E. Wunderlich, kiu partoprenas en ĉiuj institutaj laboroj. A. BEHRENDT.

L a b o r i s t a m o v a d o. La unuaj lab. grupoj fondiĝis en 1908—10 en Breslau, Chemnitz, Hamburg, München, Nürnberg k. a. lokoj. En 1911 jam ekzistis kelkaj dekoj da grupoj kaj parto el ili kuniĝis tiujare en Germana Lab. E-ista Asocio (GLEA). La fondon de GLEA antaŭiris okazintaĵoj, en kiuj iu L. Schlaf, komercisto el Dresden, ludis iom strangan rolon. Nomita S. faris multan propagandon en lab. rondoj, organizis prop. kunvenojn, starigis kursojn kaj fondis grupojn. Li eldonis en 1910 monatan gazeton »Der Arbeiter-E-ist« (Lab. E-isto), kiel organon de iu Germana Laboristara E-ista Ligo. Ĉi tiu »Ligo« estis kreaĵo de S., li mem estis la prez.; la grupoj neniel partoprenis en ĝia starigo kaj ne havis influon sur ĝia konsisto kaj agado. Pri tio pluraj grupoj ne estis kontentaj; ili faris proponojn por kaj pri okazonta kongreso, sed S. aŭtokrate ne publikigis ilin, prokrastis la kongreson kaj eksigis la Hamburgan grupon, kiam ĉi tiu sendis siajn proponojn, kun kritiko pri la agado de la prez. rekte al la ceteraj grupoj. Laŭ peto de kelkaj gravaj grupoj la Hamburga preparis kongreson, kiu okazis je Pasko 1911 en Leipzig kaj kie oficiale fondiĝis GLEA. Oni esploris la agadon de S., konstatis, ke li ne agis honeste kaj forigis lin el la kongreso. Entute ĉeestis 45 grupoj el kiuj 25 kun 600 membroj aliĝis al la asocio. Kiel prez. oni elektis F. Zuckarolli, al kiu oni ankaŭ komisiis la redaktadon de la aperigota asocia organo »Antäuen«.

La starigon de GLEA sekvis regula kreskado de la movado. En la fino de 1911 la asocio jam nombris pli ol 700 membrojn, en 1913 ĝi havis 70 grupojn kun 1400 membroj. Ĝi eldonis prop. broŝuron germanlingvan »La germana laboristo kaj la mondhelpingvo E« de P. Werner kaj Adresareton. Krom Zuckarolli ankaŭ F. Hegewald, G. Stein, A. Schiemeck kaj A. Mehlhorn servis kiel estraranoj. En

1913 okazis en Frankfurt la dua kongreso de GLEA, kiun partoprenis ankaŭ kelkaj alilandaj delegitoj por ĉeesti la preparolojn pri la temo Int. Organizo. La GLEA-estraro projektis detalan statuton, laŭ kiu la fondota Internacio konsistu el landaj asocioj, estu religie kaj politike neŭtrala kaj celu ĉefe subteni la propagandon.

Ne funkciinte dum la mondmilito, GLEA reekvivis en 1919 kaj reaperigis sian gazeton Antaŭen. En 1920 ĉi tiu alinomiĝis »Deutscher Arbeiter-Eist« (Germana Lab. E-isto). Redaktoro: P. Rauschenbach, aliaj funkciuloj: Hegewald, A. Müller, Schiameck kaj Mehlhorn. La 3-a kongreso okazis en majo 1920 en Hannover. Repräsentitaj estis 18 grupoj. Oni ĉefe pri-traktis internajn aferojn. La punkton »Int. Aferoj« oni ne preparolis pro resto de alilandaj delegitoj. Estis starigata Int. Informejo, gvidata de K. Schmidt, kiu celis helpi »ĉiujn demandantojn pri laborkondiĉoj kaj ĉiuj aliaj lab. aferoj«. De tiam GLEA denove firmapaŝe antaŭeniris. En majo 1922 ĝi havis 85 grupojn kun ĉ. 2000 membroj. Propra lernolibro verkita de F. Hegewald aperis en tria eldono. Ok diversaj flugfolioj estis eldonitaj. Akcioj de la »Dua monpruntado 1920—24« estis jam en 1922 parte repagataj. Sespaga, grandformata aperis ĝia gazeto. En la 4-a kongreso en Düsseldorf en 1922 estis proponate — sub influo de la tendenco al pli da per-E-a laboro — la malfondo de GLEA. Ĉi tiu propono estis malakceptata. La kongreso esprimis la opinion, ke SAT estas la subteninda mondorganizo de la lab. E-istaro. Oni decidis liveri al la membroj la SAT-organon »Sennacieca Revuo« kun germanlingva aldono. Hegewald, prez. kaj Rauschenbach, red. estis anstataŭataj de W. Keller kaj A. Sproeck. Adm. iĝis J. Münch, kiu ankaŭ prizorgis la Librejan Fakon. Oni ŝanĝis la nomon de la asocio je Lab. E-Asocio por la germanlingvaj regionoj. La decido pri livero de SR oni devis baldaŭ repreni pro monmanko. AE daŭris aperi, sed en malpliigita amplekso. De sept. 1924 ĝis la fino de 1925 AE servis kiel oficiala publikigilo de la Aŭstria Lab. Ligo E-ista. La red. de AE, A.

Sproeck, ne estis favora al SAT kaj lia vidpunkto kompreneble iel influis lian redaktagadon. Ĉi tio okazigis en 1927 konflikton inter la tiama estraro, konsistanta el H. Hempel, O. Bässler, k. a. kaj la red. Temis i. a. pri artikolo ataka al la komunista movado, kiun la redaktoro volis enpresigi kontraŭ la deziro de la estraro kaj pri aldono de la SAT-gazeto »La Lernanto« al AE kun samtempa malampleksigo de la lastnoma gazeto. Kaŭze de ĉi tio okazis Paskon 1927 eksterordinara kongreso, kiu aprobis la agadon de la estraro kaj elektis kiel redaktoron de AE K. Deubler. Oni devas konstati, ke LEA kvamkam ĝi regule funkciis dum 1923—27, ne multe progresis. En 1923 la membronombro estis ĉ. 3200, en 1924 ĉ. 2900, en 1927 ĉ. 2900. Kaj tamen okazis en tiuj jaroj kursoj kun entute kelkaj miloj da partoprenantoj. La Libreja Fako, starigita en 1922 kaj de 1924 prizorgata de la salajrata oficisto A. Birke, eldonis krom diversaj propagandiloj lernolibron de F. C. Richter kaj en 1925 unu lernolibron gramatik-metodan de K. Deubler kaj unu rektmetodan de L. Puff. En 1927 ĉi tiu Fako gajnis pli ol 5000 markojn. Jam en 1922 LEA starigis Gazetar-Servon, kiun gvidis tiam B. Viktorin. Ŝajne ĝi ne prosperis, ĉar en 1924 oni oficialigis la Proletan E-Servon de la grupo Leipzig. Ĝin gvidis sinsekve E. Lammerhirt, O. Bässler, W. Kampfrad. En 1928 ĝi aperigis pli ol 800 por kaj pli ol 300 per-E-ajn artikolojn en la lab. gazetaro. En 1929 ĉi tiuj nombroj estis 1300 kaj 380.

Estas menciinda provo praktike utiliĝi E-n por lab. celoj per aperigo de granda duonmonata, germanlingva gazeto »Spegulo de la Popoloj«, eldonita de la Leipzigaj lab. E-istoj. La gazeto raportis pri lab. vivo, laborkondiĉoj, politika kaj ekonomia situacio en ĉiuj landoj. La tuta materialo konsistis el leteroj de E-aj korespondantoj, artikoloj el SAT-gazetoj ktp. Ape- ris 16 numeroj.

Laŭ la raportoj en la kongreso en Nürnberg 1928 LEA havis tiujare 163 grupojn kun 3116 membroj. Du jarojn poste la membraro nombris 3600. Okazis la 8-a kongreso en Essen. Ĝia plej grava decido estis, ke LEA aliĝu

al IFA, komunistema grupiĝo de kultur-organizoj. Per ĉi tio LEA forlasis sian supertendencan starpunkton kaj la sekvo de tio estis, ke multaj nekomunistemaj LEA-anoj ekŝiĝis el la asocio. De tiam LEA pli agadis laŭ komunista starpunkto, agitis por kontakto kun Sovetio, aliĝis al IPE kaj propagandis por ĝi, ktp. Ĝi vigle kaj sukcese laboris ĝis kiam en 1933 la starigo de la nacisocialista reĝimo finis ĝian ekziston.

Parto de la ekŝiĝintaj anoj starigis en 1930 la Socialista E-Asocion (SEA), kiu pretendis daŭrigi la tradicion de LEA, akceptante kiel membrojn ĉiutendencajn lab. E-istojn. En 1933 ĝi havis ĉ. 1500 membrojn. Kiel ĝia oficiala organo servis »La Socialisto« de ALLE (Aŭstrio). Ĝi eldonis »La Lab. E-ismo«, de Lanti en la germana lingvo, kantanon, lernolibron kaj infan-gazeton »Amikecon!« Estraranoj estis i. a. A. Sproeck kaj L. Puff. Ankaŭ ĉi tiu asocio estis malpermesata de la nova reĝimo.

Kelkaj ankoraŭ nemenciitaj aktivuloj: P. Bennewitz A. Bolle, J. Burger, E. Bitzer, F. Deiters, A. von der Heid, K. Hubricht, P. Kockeritz, H. Nonnenmann, H. Remers, J. Roth, H. Theobald, A. Schwenk, L. Speth, Vildebrand, G. Volkert, A. Wendt.

Gernet Vladimir, ruso, kemiisto kaj dir. de vinber-instituto apud Odessa. Nask. en 1870. Pioniro de E, jam en 1894 grupiĝis ĉirkaŭ li aro da fervoraj E-istoj en Odessa. Kunfondinto de la L. I., kiun li monsubtenis. Longe korespondis kun Z. Havis multajn malagrablaĵojn pro la rusa cenzuro. (I. detaligo en lia intervjuo en »Kvardek jaroj.«) Trad. Fantomoj de Korolenko, 1896, 49 p.; Pentraĵoj el vojaĝo de Heine, 1897, 16 p.; la faman leteron de Z al Borovko. Kunlaboris krom L. I. je La E-isto, L' E-iste, ktp.

Gething William Alfred (»Wag«), anglo, registara oficisto. Nask. 3 nov. 1896 en Luton. Sekr. de Sud-Mezlanda Fed. de ĝia fondiĝo. 1928—30 preparis E notojn por Daily Herald (laborista gazeto) kaj gvidis korespondan kurson (300 aliĝintoj) por ties legantoj. Oxford kongreskomitatano. Ano de Administra Ko-

mitato de BEA 1926—30. Hon. sekr. de BEA, 1931.

Geyer (gajer) Reinaldo Frederico, brazilano, d-ro, kuracisto. Mortis. Kunfond. kaj unua ĝen. sekr. de BLE. Aliĝis al Ido, kiun li poste forlasis. LK elektita en 1912.

Ghezze (geco) Arturo, italo, d-ro, prof. Eklaboris pri E en Trieste en 1909. Lia prop. kaj instrua laboro estis de tiam tre grava por la regiono Istrio. En 1911 sukcesis la prof. ekzameno de E ĉe la Supera Instituto de Antwerpen. L. K. de 1913. Senombraj paroladoj kaj kursoj. Dum la milito la aŭstra polico persekutis lin pro lia E-ista agado kaj li estis internigita en la kampon de Lebring (Stirio). Prez. de E-ista Rondo en Trieste kaj prez. de itala E kongreso en 1922. Verkoj: Lernolibro; tri festparoladoj okaze de landaj kongresoj; teatraĵoj: Lia Ventumilo; Kiam Amo parolas; Fraŭlinoj, imitu min; Vi sola E povas fari tiajn miraklojn; Aventuro de Karnavalo.

Giambene (ĝambene) Luigi, italo, d-ro teologia, katolika pastro, mensinjoro, prof. de hebrea kaj greka lingvoj en Universitato de »Propaganda Fide«. Nask. 26 nov. 1866 en Roma. E-isto de 1902, pioniro en Roma, kie li fondis en 1905 E Societon, en 1919 kunfondis »Roma E-Instituton.« Verkis I-E Vortaron, 1907, gramatikon kaj antologion Tra la E-a Literaturo. En 1908 red. de Roma E-isto. Kursoj, artikoloj, paroladoj.

Giesswein (gisvejn) Sándor, d-ro, hungaro, prelato kaj politikisto. Nask. 4 febr. 1856 en Tata, mortis 15 nov. 1923 en Budapeŝt. Krom teologiaj studoj li okupiĝis multe pri filologio, sociologio ktp. Pioniro de pacifismo, feminismo kaj de aliaj sociaj reformklopodoj. De 1912 E-isto kaj prez. de HES ĝis sia morto. Li faris paroladojn pri E en multaj H urboj, pledis kelkfoje por E en la parlamento, dum du UK-j reprezentis la hungaran ministron de la edukado. Dum kelkaj kongresoj li celebris meson kaj predikis en E, estis en la gvidantaro de int. E societoj. Dum sia lasta vespero li instruis E-n al sia parenco.

Gili-Norta Joan, kataluno, komercisto. Nask. 16 marto 1891 en Barcelona. E-isto de 1909. Fondinto de loka EG, estis prez. de KEF, ĉefa subtenanto de K-a Antologio, ktp. Skribis kelkajn amuzajn teatraĵojn pri E, kiuj estas tre ofte reprezentataj en K-aj grupoj.

Gillette (gilet) Mary C., anglino. Nask. 21 aŭg. 1866 en Banbury. Edziniĝis je John P. Gillett, magistrato. Amanto de pentrado kaj ĝardenkulturo. Malavare subtenadis dum multaj jaroj la E movadon naciajn kaj internacian. Kvakerino.

Giner Joaquin Moreira, urugvajano, d-ro. E-isto de 1923. Kunorganizis la I-an Sudamerikan E-Kongreson. Estis prez. de UES.

Ginevra. Lirika dramo, originale de Privat, laŭ malnova int. legendo el kelta deveno. 1913, 48 p. Ludita dum la UK-j en Bern, 1913, kaj en Genève, 1925. «Pli bone ol pri la drama, ĉ. sukcesis pri la lirika parto de sia verko.» (Valc, Germana E-isto, 1913, B. p: 166.)

Ginz (ginc) Otto, ĉeĥoslovako, oficisto en grandkomercio en Praha. Nask. 19 jul. 1896 en Zdáňice. Depost 1918 partoprenas tre aktive kaj diversmaniere la movadon. Precipe li sukcesis organizante gazetan servon de CAE. Multon laboris pri enpentrado de E en radio-sferon. Verkis: Radio-amatoro vortaro kvinlingva, E-a-ĉeĥa-germana-franca-angla. Tradukis ĉeĥlingven el E la originale norvegan verkon de Odd Arnesen Per aerŝipo al la norda poluso, 1929.

Giroud (jiru) Hélène, svisino, prof. en blindullejnejo en Lyon. Nask. en 1867 en Baset (Svisujo). Estis la unua blinda E-istino, kaj la unua blinda prof.-ino en la mondo (dum la lernjaro 1895—96). Ellernis E-n 1895 sen libro, nur buŝe, kaj ŝi verkis libreton en Braille; ŝi instruis la plej bonajn ĝelernantojn de sia klaso, kaj daŭrigis dum multaj jaroj tiun prop. taskon ĉe blinduloj.

Giuglea (ĝuglja) Ion, rumano, red. en Bucuresti. Nask. 6 sept. 1882 en Ploesti. E-isto de 1906. Dum 1908—09 okupis sin ekskluzive pri E, RES kaj RE-isto. Unua UEA-del. en R.

Partoprenis la organizadon de la unua rumana kongreso.

Glodeau (glodo) Ludoviko, franco, kaldronisto. Nask. 24 marto 1891 en Trelaze. E-isto de 1905. Aligis al »Liberiga Stelo« en 1910. Sekr. de la Fed. Sindikalista E-ista en 1918. Kunfondis Fed. E-ista Lab. kaj estas ĝia adm. de ties fondiĝo. Helpis al la starigo de SAT kaj administris E-istan Laboriston kaj Sennaciecan Revuon.

Glück (glük) Julius, germano, inĝ., dir. de fabriko en Berlin; faka verkisto. Nask. 12 marto 1877 en Duschnik (Ĉeĥosl.) Varbita por E en 1907 pere de prof. Ostwald kaj dediĉis preskaŭ la tutan vivon al E. Faris prop. laboron en Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Pollando, Germanujo kaj Francujo. Estis estrarano de la UEA en Wien, de GEA, prez. de pluraj EG-j kaj tiu de la EA en Berlin ktp. Faris 104 E-paroladojn en Radio-Berlin, inter ili 3 radiokursojn. Verkis prop. artikolojn por ĉ. 40 germanaj gazetoj kaj revuoj. Posedas la prof. diplomon de Int. Instituto de E, estis ekzamena komisarano de tiu Instituto kaj tiu en Aŭstrujo. Ĝis 1933 gvidis 208 E-kursojn; laŭ sia kalkulo li havas ĉ. 30.000 E-lernantojn en G-ujo. Partoprenis ankaŭ la int. E-movadon. Kunlaboranto de LI, La Revuo, »E«, HDE k. a. Verkoj: germanlingva lernolibro (kun Sós), 1910, ĝis 1933 eldoniĝis 35.000 e-roj; g. lernolibro por memstudado kaj radio; aliaj lerniloj, ankaŭ en periodaĵoj; Albumo pri la UK 1912 en Kraków (ĉeĥkunlaboranto).

Glumarkoj. v. Sigelmarkoj.

Godart (godar) Justin, franco, eksministro. Malnova amiko de E, honora ano de UEA. Dum la milito, estante gvidanto de la armea sanitara servo, li organizis en 1916 disdonon de lernolibro »E kaj Ruĝa Kruco« inter kuracistoj kaj tlegistoj. Klopodis por E ĉe la Int. Laboroficejo kaj en 1922 protestis ĉe Bérard pro la kontraŭ-E-a cirkulero.

Gödecke Adolf Eduard Wilhelm, d-ro, devene germano, post daŭnigo de l' germana nordzono senŝtatulo. Advokatkandidato, privatinstruisto. E-

isto de 1906, ano de UEA de 1908. Kunfondis en 1925 ES en Sönderborg. Estrarano grupa kaj liga, ano de ekzamena komisiono. Laboras por E ankaŭ en Paneŭropaj rondoj.

Gogeliani B., fervora pioniro de E en Kartvellido; mortis en 1910. E-isto jam en la infanaĝo. Li studis en la universitato de Genèvo kaj reveninte sian patrolandon, baldaŭ estis arestita pro politika afero kaj metita en malliberejon de Tiflis, kie li instruis E-n al multaj siaj samsortuloj. Post unu jaro oni ekzilis lin en nordan Ruslandon, kie li ne povis elporti la klimaton kaj malsaniĝis. Eĉ tie li prop-is E-n inter politikaj ekzilitoj ĝis la lastaj tagoj de sia vivo. El sia ekzilejo kunlaboris al *La Ondo de E k. a.*

Göhl (göl) Gustav Hermann, germano, d-ro, prof., studkonsilisto, reallernejestro. Nask. 17 jun. 1859 en Mitteloderwitz, mortis 11 jan. 1931 en Neugersdorf. Studis teologion, germanistikon kaj modernajn lingvojn. E-isto de 1908. Grupestro en Riesa kaj poste en Neugersdorf. Del. de UEA, 1912—31. Prez. de G Akademia E Ligo, 1922-26. LK de 1929. Kunlaboranto de multaj gazetoj, recipe de GE-isto, por kiu li redaktis dek jarojn la gram. ekzercojn. Verkoj: prop. broŝuro; lernolibro; prilaboris la duan eldonon de *La devèze: Demando; lia plej grava verko*, pri kiu li laboris seninterrompe 8 jarojn kaj kies lastajn foliojn finis malmultajn tagojn antaŭ sia morto, estas detala gram. de E (G-e).

Goldberg Martin, instr. popollerneja en Leipzig. Nask. 16 aŭg. 1890 en Gross-Schönau. Dum pluraj jaroj plenumis valorajn servojn por TAGE kaj ĉe la eldono de *Int. Ped. Revuo*.

Goldmann Anton, aŭstro-germano, urba sekretario en Stab, ĈSR. Nask. 3 febr. 1889 en Probsdorf ĉe Wien. E-isto de 1922. Aranĝis kursojn en popolatlernejo de St. Pölten, 1923—26; Kunfondis EG samloke. Verkis germanan flugfolion en 10.000 e-roj.

Goldsmith Cecil Charles, anglo, organizanto. Nask. 16 nov. 1889 en Gloucester. Edukigis ĉe la teknika

lernejo kaj la universitato en Birmingham. Oficiro en la brita armeo dum la granda milito; vundita en Francujo. Sekr. de Birmingham ES kaj Mezlanda EF dum multaj jaroj. Administranto de BEA, sekr. de la Brita Teritorio de UEA, direktoro kaj sekr. de The E Publishing Co. Ltd.; sekr. de la britaj E kongresoj en Birmingham 1920, Leamington 1923, Canterbury 1929 kaj Birmingham 1931. Gen. sekr. de la 23-a UK en Oxford, 1930. Organizis multajn E karavanojn al diversaj landoj.

Gonzaga Leonel, brazilano, d-ro, kuracisto. Prez. de la 7-a B. Kongreso de E. Verkis lernolibron.

Gordon George (ps. Gego), irlandano, bankisto. Nask. 22 febr. 1857 en Gorex, Irlando. Familio enmigris Nov-Zelandon 1858. Loĝas en Christchurch (N. Z.) E-isto de 1906. Verkoj: *Kara Panjo*, 1911; *La Kamena Angulo*, 1913; *Alegorioj el la Naturo*, 1913 kaj 1922; *Lia lasta ŝanco*, 1915; *Indekso al E Angla Vortaro de Millidge*, 1924.

Gorgues (gorges) Francisko, hispano, prof. pri komerco. Nask. 11 sept. 1900 en Barcelona. Jam dum la mondmilito li kontribuis konservi int. fokuson de E-ismo, poste estis sekr. de la komitato »Por malsataj aŭstriaĵ infanoj« kaj de KEF. Gvidis kursojn, publikis en grava ĵurnalo »Las Noticias« de 1929 ĉiudimanĉan rubrikon pri E. Del. de UEA kaj USE.

Göteborg (Gotenburgo). Urbo en Svedujo kun 230.000 loĝantoj. 8-a kongreso de SAT 14—18 aŭg. 1928 kun ĉ. 400 partoprenantoj el 24 landoj. Konvencio inter SAT kaj LEA-oj. Akcentado de la kultura, eduka, nepolitika kaj kontraŭdogma karaktero de SAT. BRUIN.

Grabowski Antoni, polo, inĝeniero. Nask. 11 jun. 1857 en Nowe Dobre (Pomeranio), mortis 4 jul. 1921 en Warszawa. La inĝenieran diplomon li akiris en Breslau. Post laborado en kelkaj polaj urboj li ekloĝis definitive en Warszawa. Fervorulo de sia profesio. De li aperis traduko de ĥemia verko de l' anglo J. Remsen kaj Pola Teknika Vortaro. — E-n li ekkonis en 1887. Inter li kaj Z okazis la

unua E-a konversacio. Li perfekte parolis ankaŭ Volapukon, viziis ankaŭ pastron Schleyer (dum tiu ĉi vizito evidentiĝis, ke mem la aŭtoro ne estas tute sian malfacilan lingvon). Granda poligloto: li posedis pli-malpli ĉ. 30 lingvojn. Dum kelkaj jaroj li estis unu el la ĉefoj de la reforma movado, serĉante la kaŭzon de la malrapida disvastiĝo de E en ĝia malperfekteco. Sed post la decida voĉdono en 1894, li definitive rekonis, ke la ĝenerala akcepto, sen rezonado, estas multe pli grava ol la perfekteco cetere senfine pridiskutebla.

»**Tablo** — li diris — devas esti nomata **tablo** ne pro ĝia logika aŭ alia rezono, sed tute simple pro tio, ke tiel volis Z; se li estus volinta ĝin nomi **tiŝo**, ni ĉiuj akceptus tiun ĉi vorton...« Kaj de tiam li restis fidedela fundamentano, ĝis sia morto. — G. vige partoprenis en la E-movado: ekde 1904 li estis prez. de la Varsovia ES; kiun, plenan de disopiniantaj korifeoj, plurfoje savis de la disfalo lia aŭtoritato kaj diplomatio. En 1908 li okupis la prez.-econ de la tiam fondita PES kaj tenis dum sia tuta vivo ĉi tiun postenon, tre delikatan kaj ĝenan, parte pro la politikaj cirkonstancoj, parte pro la internaj disfalingemaj tendencoj. Dum la milito, li, kiel germana regato, devis forlasi Warszawa. Reveninte dum la germana okupacio, li trovis sian domon malplena: liaj familianoj formigris en Rusujon. Tiam, en la dezerta domo, li komencis kaj finis la tradukon de Sinjoro Tadeo, kiu laboro estis la sola konsolo, krom liaj oftaj kaj longaj vizitoj al Z. Post la morto de Z li iĝis tre soleca, kaj pli kaj pli turmentis lin ankaŭ lia kormalsano, kiun li ne povis konvene kuracigi pro liaj premaj financaj cirkonstancoj. Kiam lia familio revenis, li jam estis preskaŭ elĉerpita korpe. Tamen, seninterrompe li laboris plu por E, ĝis sia subita morto (lin mortigis kortatako antaŭ la montrofenestro de E-a librovendejo). — Kiel lingvisto, G. prezidis la gramatikan sektion de la Akademio. Ĉi tiun taskon li plenumis kun granda kapablo, kiun Wüster prave nomas »vivoraska intuicio«. Li estas verkinto de **Granda Vorto-**

aro Pola-E kaj E-Pola. — Plej grava, tamen, estas lia literatura kaj precipe tradukpoezia agado. Liaj prozaj tradukoj relative estas malmultnombraj; en ili ni trovas la saman klaran, simplan, perfektan stilon, kiel ĉe Kabe. — Tiom pli ampleksa estas lia tradukpoezia verkado. El ĝi elstaras la int. poemantologio **Parnaso de Popoloj kaj precipe Sinjoro Tadeo**, epopeo de Miczkiewicz, en formidela traduko; ĉi lasta estas unu el la plej grandaj fortostreĉoj de la E-a traduk-arto, per ĝi G. fariĝis vere la patro de la E-a poezio. — En ĉi tiu libro G. estas kuraĝa evoluiganto de la poezia lingvo E-a. Frue li rekonis, ke lingvo, kiu pretendas havi poezion, ne povas esti vortmalriĉa, do li ne timis la enkondukon de novaj vortoj. Lia vorto-trovemo estas plej ofte tre feliĉa: el la 209 neologismoj de Sinjoro Tadeo pli ol la duono eniris la Plenan Vortaron de SAT, kaj 25 iĝis de tiam oficialaj. — Ankaŭ cetere li estas kuraĝa tornisto de P lingvo, kelkaj liaj trovajoj (ekz. ĉi anstataŭ ĉi tiu, senpera verbigo de substantivoj kaj adjektivoj, ablativa uzo de e-finajaj substantivoj ktp.) iĝis ĝenerale uzataj de la E-aj poetoj. Lia rimtrova preteco estas granda, li ofte uzas rimojn spritajn, majstras la versteknikon. (De li devenas la vorto **ad asismo** por la sufiksrimoj). — Oni povus eble diri, ke li estas plie lingvo- kaj versartista ol poeto, ke li ofte kontentiĝas je la forma solvo, lasante forgliti la pli intiman senton, ke lia lingvo-majstreco ofte majstras ankaŭ lin mem, kaj pro tio li kelkfoje laĉigas — sed eĉ la plej severa kritiko devas eksilenti antaŭ pluraj partoj de Sinjoro Tadeo (la **Tempesto**, la **Ĉaso**, la **Koncerto de Jankjel**, la **Litva Praarbaro** ktp.), kiuj ĉiam apartenos al la plej belaj paĝoj de nia tradukpoezio. — Lia originala poezio estas malampleksa, sed oni devas menci la faman **Tagiĝon**, kvazaŭ duan himnon E-an, kaj la kortuŝan **La reveno de Pfilo**. — Verkoj krom la menciitaj: **Puŝkin: La Nega Blovado**; **La Kondukanto**; **Liro de Esperantistoj**; **Goethe: La Gefratoj**; **Sienkiewicz: Sila Tria Prus: Pe-**

koj de Infaneco; Fredo: Consilium Facultatis; Slowacki: Mazepa (dramo); Wolski-Moniuszko: Halka (opero); Antologio Internacia.

(Laŭ informoj de E. Wiesefeld.)

K. KALOCSAY.

Gramatiko, Ekzercoj, His'orio de Esperanto. De A. Stamatidis. 1922, 99 p. »La libro entenas la tutan materialon necesan por ellerni la lingvon kaj pretiĝi je diversgradaj ekzamenoj.« (G. S., 'E', 1923, p: 9.)

Gramofondiskoj. La unuan fojon fonografo estis uzita por la celoj de E en 1902, kiam E-istoj de Montreal (Kanado) sendis al Z fonografon, petante doni al ili lecionon de elparolado de E. Samtempe ili sendis al Z du cilindrojn enhavantajn la elparoladon de du kanadaj E-istoj. Z plenumis la peton, kaj ĉiuj, kiuj aŭdis la parolon de la aŭtoro de E, povis konvinkiĝi, ke lia E-a elparolado kaj tiu de la angla kaj franca kanadanoj estis tute similaj. Antaŭ la milito estis ankoraŭ aĉeteblaj diskoj kun modelparoloj de Z kaj deklamadoj de Devjatnin, Bemberg, Privat. La voĉo de Z estas aŭdebla de la gramofondisko, reproduktita en 1930 laŭ malnovaj vaksaj cilindroj, kies posedanto estis A. Sabadell (Barcelona). UEA-Jarlibro 1931, p: 47, presigis liston de diskoj en E, entute 15 pecoj. Teksto de la diskoj: instrua (precipe pri elparolado), kanto, muziko de la E-a Himno, kaj aliaj E-kantoj, popol-kantoj, operarioj. La parolanto de 5 duflankaj Linguaphone-diskoj estis E. Privat.

Grau Casas Jaume, kataluno. Nask. 2 dec. 1896 en Barcelona. E-isto kaj aktiva prop-isto de 1914. En 1920—24 li estis dir. de Kataluna E-isto. Krom multaj artikoloj kaj versajoj, aperintaj en K. E-isto, LM, HDE, k. a. kaj prop. artikoloj, al lia plumo apartenas jenaj libroj: *Amaj Poesmoj*, 1924 kaj *Novaj Amaj Poesmoj*, 1927, (ambaŭ originala poemaro); *La Kataluna Popolkanto*, 1925; *Barbaraj Prozaĵoj*, trad. de Bertrana, 1926. Estas redaktanto kaj ĉefa tradukanto de *Kataluna Antologio*, 1925. LK de 1926.

Grau-Casas Josep, kataluno, elektroteknikisto. Nask. 8 sept. 1888 en Barcelona. E-isto de 1909. Fondinto de loka EG, estis prez. kaj sekr. de Int. Floraj Ludoj kaj atingis plej altan premion en unu el ili. Oratoro, aktiva prop-isto, artikoloj, kursoj. Lerta tradukisto de poemoj de Verdaguer kaj Maragell. La ĉefa rimarkinda tradukanto de K-a Antologio post lia frato Jaume. Red. de K-a E-isto kelkajn jarojn. L. K.

Grazzini (graccini) Corrado, italo, prof., supera bankoficisto kaj librotenisto. Nask. 8 dec. 1883 en Firenze. E-isto de 1907. En 1913 fondis Nacian Societon por E inter Italaj Geinstruistoj, en 1920 fondis en Firenze la asocion »Nova Sento«, samjare la E-istan Union inter Italaj Katolikoj, havis gvidajn oficojn en ili kaj en aliaj E societoj. Multaj kursoj, ankaŭ en lernejoj. Kunlaboris en div. gazetoj, estis red. de IE Revuo. Li apartenas al Itala Katedralo de E ekde 1912 kaj de 1925 iĝis ties ĝen. direktoro.

Greffkowicz Zygmunt, (ps. Gryff), polo, jurnala propagandisto. Nask. en 1885 en Warszawa. Estis komitatano de PES. Aŭtoro de tri prop. broŝuroj pri E. (1910, 1911, 1930).

Grekaj Papirusoj. Kompilis kaj trad. Penndorf. 1927, 112 p. »Antikva egipta mondo. Diversaj tradukeroj revivigas la vivkondiĉojn de loĝantoj en Nila valo kelkajn jarcentojn antaŭ Kristo.« (G. S., 'E' 1927, p: 162.)

Grekujo. La unua E-isto estis Em. Dragoumis en Athen (1904). Favoraj artikoloj aperis en diversaj gazetoj, kiel »Akropolis«, »Deltion«, kaj »Psihiatria kaj Neurologia Revuo« de d-ro Simonidis Vlavianos, sed mem la movado ne ekfloris.

La movado komenciĝis en 1905 en la insulo Samos, (antaŭmilita Turkujo). Pioniro estis d-ro A. Stamatidis, kiu 8. dec. 1906 en la ĉefurbo Vathi fondis E-Societon (SES) kun 11 anoj. Kurson gvidis la fondinto-prez. por 24 personoj, ĉiuj troveblaj en la adresaro de Z; la plej malnova sub la n-ro 12.151. Aliaj kursoj funkciis en la komerca lernejo kaj en la mastruma lernejo por knabinoj.

Stranga epizodo haltigis provizore la progreson. Malklera vilaĝano ŝerce persvadita de du advokatoj, ke E estas nur formo de framasonio, kiu sendube havas kontraŭreligiaj celon, sukcesis konvinki kelkajn fanatikulojn en la najbara vilaĝo, ke ili, punu la malpiajn E-istojn. 30-o da ili, armitaj per bastonegoj, forkegoj, kaprompiloj kaj hakiloj iris rekte al la ejo de SES kaj trovinte neniu pro la trofrueco de la horo, kontentigis disrompi la kadron de Z-bildo kaj la bibliotekon, dispecigi la librojn kaj difekti ĉiujn meblojn. Krome ili kriadis, ke ili revenos mortigi la E-istojn, se ili daŭrigus kunveni en la ejo. La princo-reganto malpermesis la agadon de SES kun la preteksto, ke per la regula funkciado de SES la publika ordo estas malhelpita.

La nova princo-reganto 13 sept. 1907 denove permesis la societan agadon kaj SES tuj pliiĝis tiutempe, kalkulinte 235 anojn. La ateston pri studado akiris 90 E-istoj, inter ili la princino Helena Kopasis, tondintino de Virina E Grupo. En jan. 1909 estis ekdonita la gazeo Greklingva E-ano, pri kiu la samosa deputitaro decidis, ke ĝi fariĝu ŝtata kaj presita senpage en la princa presejo, kaj surportu sur ĝia unua paĝo la princindan blazonon. Okazis leĝa decido ankaŭ pri la reprezentado oficiala de Samos ĉe la 5-a UK, kiun rolon plenumis Stamatiadis. La entuziasmon pro la sukcesoj bone esprimis granda E koncerto en la urba teatro. Venis ankoraŭ pli favora leĝo sub n-ro 2342 la 8 okt. 1910, kiu E-n enkondukis kiel devigan fakon en ĉiujn lernejojn de Samos. Laŭ la Greklingva E-isto de dec. 1911 E estis instruata en 31 urboj kaj urbetoj de 50 geinstruistoj por 1740 gelnantoj.

La movado etendiĝis el Samos al la ĉirkaŭaj urboj kaj insuloj en Grekujo (kaj Turkujo). En Patras Paul Bünemana laboris por la antaŭenpuŝo de E, gvidante en 1909 du sukcesajn kursojn. En Etolikon de la provinco de Mesolonghi Georgo Sokos fondis grupeton en apr. 1909. En Arta D. G. Konstantopoulos fondis grupon samjare. Eta moviĝo estis observata en aliaj grekaj urboj, kiel en Pireo,

(f-ino Mario Tsantas), Sira, Paksos, Volo, Lamia, Tripoliso kaj en la insulo Kreto, kie J. J. Serkedakis fondis societon.

En jul. 1925 Stamatiadis reveninta post longa restado el Konstantinopolo, revigligis la dormintan SES en Samoso, aperigis dum unu jaro gazeton Samosa E-isto. De aŭg. 1926 Stamatiadis loĝis en Athen, kaj laŭ lia iniciato la ministro de instruado eldonis cirkuleron (n-ro 57.363, 28 okt. 1926.) pri la instruado de E en ĉiuj instruistaj lernejoj de elementa kaj mezgrada instruado; senpagajn kursojn gvidis la iniciatinto. La ministeria cirkulero sub n-ro 65.896, 7 nov. 1931 rilatas la daŭrigon de la instruado de E en la instruistaj lernejoj, en la gimnazioj kaj la pedagogia atlernejo. Krome la ĉefdirektoro de PTT aprobis la instruadon de E en siaj lernejoj, kaj mem Stamatiadis gvidis la kursojn. En 1927 li gvidis 2 specialajn kursojn ankaŭ por 44 policistoj. En 1926 fondiĝis Helena E Asocio, la fondintoj estis: Klisthenis Filaretos, Aristovoulis Zannos, d-ro Stamatiadis, V. Nikolaidis Mihaelo Manousos, Aleksandro Eŭstathianos, Konstanteno Stekos, Miltado Mangivas, s-ino Roksano M. Manouso, s-ino Pantelaki, Petro Duzinas. Post Athen kun siaj 7 E Asocioj (Atena Studenta E Grupo, fond. en 1928, E-ista Akademio, Helena Virina E Ligo, ambaŭ fond. en 1929) E atingis en Saloniki sub la tiama gvidado de Johano Spatharis pli da progresoj, ol en ĉiuj aliaj urboj. (Sukcesoj en PTT, Universitato kaj en la ĉirkaŭurboj.) Aliaj lokoj, kie estas movado: Pireo, Halkis, Akrata, Stavroupolis (Ĉiam Antaŭen), Kavalla, Aleksandroupolis, Edessa, Drama, Serras, Johannina, Florina, Mitileno (insulo), Kreto (Heraklion; Rethimno), Ksilokastro (La Sincereco), Kilkis, Kakovatos (Olimpio), kaj fine Andricaina kaj Patraso kaj 4 E-Grupoj en la insulo Cypruso per la zorgoj kaj perdistancaj E-kursoj de Stamatiadis.

HEA en 1931 ekŝigis el K. R. kaj ne plu kunlaboras kun ICK.

A. STAMATIADIS.

Grenkamp, ps. de Salo Kornfeld, polo, publicisto, nuntempe en Paris.

Nask. 1 jul. 1896 en Polujo. Kunlaboranto de polaj kaj trancaj gazetoj. E-isto de 1914. Unuaj paŝoj: kursoj, prelegoj, deklamoj ktp. en diversaj urboj de la t. n. Malgranda Polujo. En 1918 li eldonis ĵurnalon E-ista Voĉo kaj ekde tiu tempo li fariĝis ankaŭ E-eldonisto. G. estis unu el la unuaj aplikantoj de E en la radio-sfero. Dum la Int. Radio Kongreso en Paris li reprezentis Polujon kaj akceptigis favoran rezolucion al E. Dum pluraj UK-j li gajnis laŭdon pri deklamado kaj oratorado. Verkoj: Krioj de P'koro (poemoj), Penseroj (kompilitaj citaĵoj), Kuzeto (1925, trad. komedieto de Balucki), Vortoj de Cart (1927); Kompletata Gramatiko kaj Vortfarado de E (1930, kompletigo de verko de Fruictier); Lernolibro por poloj. 5,000.000 (originalaj noveloj, 1931), Vivo de Cart, (1932), Pol-Pomeranio (trad. de la politika verko de Smogorzewski, 1932); Plena Vortaro de E (kunredaktoro, 1931); Pola Folkloro kaj Popolkanto (1933); Pri la moderna arto, 1933. El lia verkaro la plej signifaj estas la lingvistaj kaj publicistaj verkoj. L. K. E. WIESENFELD.

Griffin Alfred, anglo, kontisto. Nask. 3 jul. 1858 en Liverpool. Pioniro de sten. Prez. aŭ sekr. de multaj publikaj bonfaraj societoj. E-istiĝis en 1905. Unua E-isto en urbo St. Helens. Fondis grupon kaj federacion lokajn.

Grigorov Asen, bulgaro, oficisto, loĝas en Sofia. Aŭtoro de E-versaĵaro Garbo kaj de du vortaretoj, kunred. B. E., nun agas inter laboristoj.

Grna (grnja) Josef, ĉeĥo, instr. dir. de burĝa lernejo. Mortis 14 jun. 1919 en Trnavka. Tradukis areton de rakontoj de ŝatata ĉeĥa verkisto Jakub Arbes; la libro estas unua traduko el ĉeĥa literaturo, (1907).

Grosjean-Maupin (groĵan-mopen) Emile, (ps. Fakulo), franco, licea prof. Nask. 19 febr. 1863 en Nancy, mortis en 1933. Emerita Dir. de la ŝtata altlernejo por geblinduloj en Paris. E-iĝis en 1906. Okupiĝis ĉiam kaj preskaŭ

ekskluzive pri lingvaj demandoj. Verkis tre multajn recenzojn kaj prilingvajn artikolojn en multaj gravaj gazetoj: La Revuo, E. T., L. M., kaj multaj aliaj. Konstanta redaktoro de Franca E-isto dum ĝia tuta ekzistado (1908—1921). — Kvankam zorge atentante la specialajn bezonojn de la poezio kaj literaturo, li tamen senĉese admonadis, ke oni devas nenion troigi, ke la esenca kaj plej necesa eco de lingvo int. estas la facileco, kaj plidikigo de la vortaro estas ofte ne pliriĉigo sed nur balastigo. Cart, nelonge antaŭ sia morto, skribis en la epilogo de sia libro »Vortoj de Prof. Cart«: »En tiu ĉi kvazaŭtestamento mi deziras enskribi ankaŭ la nomon de mia kolego prof. Grosjean-Maupin, kiu de la komenco de mia prezidanteco pli ol iu ajn faciligis mian Akademian agadon«. — Ano de LK en 1909, Akademiano en 1920, li tuj fariĝis Direktoro de la Komuna Vortaro, kaj alportis la sperton de siaj multjaraj leksikologiaj laboroj. Nome li pristudis kaj starigis la listojn de la novaj vortoj oficialigitaj, kaj redaktis la Oficiala Klasika Libro. La ĉefa leksikologiisto de E. — Krom diversaj broŝuroj li verkis: Kun Aymonier: Cours Méthodique d'E. Kun Becker: Cours élémentaire pratique d'après la méthode combinée, 1909, tradukita italen, persan, ktp. Kun Sprotte: Praktisches E Lehrbuch, Berlin, 1910. Tradukon de Thiebaut: La formortinta Amiko, 1921. Sed liaj precipaj verkoj estas la tre kompletaj kaj detalaj vortaroj E-franca, 1910, kaj tranca E, 1913, kies pluraj eldonoj jam aperis. Fine li estis la ĉefa aŭtoro kaj la direktanto de la fama Plena Vortaro de E, 1930, nur E-e redaktita, kiu markas daton en la leksikologio de E. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

L. BASTIEN.

Grots, Edgars, latvo. Nask. 1894. Ĝis apr. 1926 dua budhana monaĥo en Latvolando, ano de la ordeno »Sangha«. Vegetarano, abstinenculo. E-isto de 1910. Estrarano de Latva ES 1922—1928. UEA-videl. en Riga 1925—1932. LK de 1927. Gazetartikoloj.

Grupoj unuaj. La unua grupo estis la volapükista klubo de Nürnberg, grava germana societo fondita 18 febr. 1885; en 1888, sub la influo de la agado de Einstein, en sia plena ĝenerala kunveno, laŭ propono de la prez. (Christian Schmidt), post varma diskutado, ĝi konvertis sin tuta al E. En okt. 1889, tiu klubo fondis nian unuan gazeton, »La E-isto«. En sia unua jaro tiu gazeto raportas nur pri la fondo de grupeto en Moskva kaj de klubo en Sofia, pajlaj fajroj, el kiuj restis nenio.

Projekto de Ligo E-ista por la disvastigo de la lingvo per fondo de grupoj aŭ kluboj estis longe ekzamenata en kelkaj n-roj de l' E-isto. Z apogis tiun projekton, ĉar li vidis en la estonta Ligo la leĝdonanton de nia afero, kiu decidus pri ĉiuj ŝanĝoj en la lingvo; tiel la Ligo fariĝus ne por-propaganda grupiĝo, sed Akademio.

Resume, jen la unuaj grupoj laŭ kronologia ordo (inter krampoj la fondintoj) laŭ la Historio de E de Zakrzewski.

- 1888 — Nürnberg (Chr. Schmidt)
- 1889 — Moskva, Sofia (Bogdanov)
- 1890 — Schalke (Trompeter)
- Ivanovo-Voznesensk (Grabowski)
- 1891 — München, »Societo E-istoj«, fond. de L. E. Meyer
- Nürnberg (Int. Klubo de Korespondado)
- Uppsala (S. Lundström)
- Murom (W. Brzozowski)
- Freiburg en Badenujo (d-ro Haas)
- Peterburg (Art. Florell) (solenia malferma kunveno 24 marto 1892)
- 1892 — Malaga
- Göteborg (G. Backman)
- Osterby (Ossian Holmquist)
- Erlangen (Fr. v. Briesen)
- Schweinfurt (P. Kramer, Kirschner, Brand)
- Vilno (A. Naumann)
- 1893 — Varsovio (Al. Blumental, Rubin, J. Wasniewski)
- 1894 — Steneby (Lindgven)
- Odessa (Gernet, Borovko)
- Reims-Soissons (Huisson)
- Helsingfors (W. Fagerstrom)

1895 — Vladimir (V. Solodihin)

El tiuj societoj restis nur 3 en fino de 1904: Uppsala, Peterburg, Odessa. Kelkaj estis nur kelkmonataj, kiel la grupo de Reims-Soissons, kiu konsistis el junaj liceanoj.

En jan. 1897 Chavet kun Dannemuller (du junaj liceanoj) fondis la E-istan Klubon de Louhans (Francujo). Tiu societo konsistis el kelkaj junuloj en Louhans (kun Alice Roux); sed baldaŭ ili propagandis eksteren, kaj la societo kreskadis. Ĝi ĉesis en 1898, kiam Beaufront fondis SPPE, en kiun ĝi fandiĝis. Se oni esceptos la negravan danan societon E-istan, fonditan 20 apr. 1897, SPPE estis la unua E-ista Societo, kies agemo etendiĝis sur tuta lando, kaj eĉ sur alilanduloj. Ĝia jarlibro por 1899—1900 enhavas 313 nomojn, el kiuj nur 169 en Francujo kaj kolonioj, kaj la aliaj en 16 aliaj landoj. L. BASTIEN.

Guadet (gade) Julien, franco, prof. de matematiko ĉe ŝtataj liceoj. Nask. 18 jun. 1886 en Paris. Jam juna interesiĝis pri E, sed lernis en 1922. En 1925 prez. de la Komisiono por Instruado. Kunfondinto de la »Ligue Française des Amis de l'E«. Prop. ĉe la univ.-anoj (ĝen. sekr. de la Fed.). Artikoloj pri instruado de E kaj broŝuro (1929).

Guerineau (gerino) André, franco, subestro de radiofonia oficejo. Nask. 18 dec. 1896 en Bagnaux (apud Angers). Unua propagandisto en Hindoĉinujo, kie li estis la sola E-isto. En 1931, uzante favoran okazon (tramanda vojaĝo de Peraire bicikle), li ekdisvastigis E-n, fondis plurajn grupojn, igis favoraj al E francajn aŭtoritatojn de la Publika Instruado, kaj kreis en 1932 la Federacion de Hindoĉinujo.

Guéritte (gerit) Tony Jules, franco, konstrua inĝeniero. Nask. 7 marto 1875 en Blots, Francujo; vivas en Surbiton, Surrey, Anglujo. Konsilanto de ministro por eksterlanda komerco de Francujo; prezidinto de Franca Komercambro en Londono, de Societo de Inĝenieroj (Britujo), ktp. E-isto de 1906. Gvidis la unuan Ekursion por laboristoj de Consett Iron Works. Du presitaj prelegoj pri temo: »E

kaj la inĝenieroj» (1914 kaj 1931). Diversaj paroladoj pri E en London, Newcastle, Gloucester, Consett, Paris, Lyon, Le Havre, Locarno. Artikoloj por ĵurnaloj anglaj, francaj, jugoslavaj, portugalaj. Lia E libraro enhavas 1772 verkojn. Eminente kapabla, komprenema kaj helpema subtenanto de laboroj kaj laborantoj por E.

A. BERGER.

Guinart (ĝinar) Antonio, hispano, pastro katolika, prof. de modernaj lingvoj. Nask. 4 sept. 1867 en Valencia. En 1900 vizitis lin en V. pioniro de E Jimenez Loira, por interesigi lin. (red. de monaĥa revuo) pri E kaj lasis ĉe li pakojn da E-ajoj. Post multa ripetado de la vizitoj G. kvaŝaŭ nur pro komplezemo, eklegis la paperojn kaj fariĝis fervora E-isto. Li aperigis ses artikolojn en sia revuo, poste verkis gramatikon kaj vortaron. Estis red. de La Suno Hispana, sekr. de H Societo por prop. de E. Bona oratoro, sukcesa kursgvidinto. Dum la Unua Nacia Kongreso de E 1923 oni enmetis marmoran ŝtonon ore gravuritan en la muron de la kolegio, kie estis la lulilo de E en Valencia.

Guitart Janer (ĝitar' faner) Francisc, kataluno, terkultura teknikisto. Nask. 16 apr. 1896 en Vendrell. Prez. de EG en Vendrell, kursgvidanto, organizinto de KEF-kongr. en 1933; por- kaj en E-aj artikoloj.

Guminski J., ruso, d-ro. Loĝis en vilaĝo Rovnoe, sed ofte vizitis Saratov-on, kie li estis senlaca dairiganto de la agado de A. Filippov. «...li ĉie kaj ĉiam semis bonan semon, ne ŝparante siajn fortojn kaj elspezojn.» (Z en La E-isto, 1892, n-ro 12.)

Günther (Ginter) Jan, polo, ĝis 1906 militisto (kolonelo), poste industriisto. Nask. en 1862 en Litovujo, nun loĝas en Warszawa. Estas famaj en la rusa armeo liaj Güntheraj litoj, kiuj liveris al li multe da mono. Dum 6 jaroj li eldonis P E-iston kaj multajn valorajn E librojn.

Gustaf Vasa. Historia dramo de R. Schmidt. La unua dramo originale verkita en E, 1910, 83 p. «La stilo estas ĝenerale bona, kvankam ofte iom duba.» (LI, 1910, p: 574.)

Gutmann Robert, estono, meteorologiisto, mezlerneja instr. Nask. 18 okt. 1882 en Tallinn. E-isto de 1931. Eldonis prop.-ilojn kaj instigis ilian vendadon tra tuta Estonujo. Fondis E sektion de la Tallinna Instr. Soc. Lia edzino, G. Faina, rusino, kaj la tuta familio estas E-istoj.

Gvatemalo, Centra Ameriko. Pioniro estis en 1906 Abato Abrill, kiu en urbo Gvatemalo estis rekompencita (dum nacia ekspozicio) de la registaro per ora medalo por la prop. de E. Liaj prop. artikoloj aperis en »Boletín de la Exposición« kaj »La Republica« En urbo Guatemala la Antigua li fondis EG-n kaj klubon de junaj E-istoj »Geinfana Z-a Grupo«, eĉ kelkan tempon eldonis gazeton Centrameriko E-ista. Sed la movado baldaŭ ĉesis kaj laŭ la Dietterle-statistiko en 1928 E-istoj troviĝis nur en San Pedro. Laŭ la ICK-raporto 1929 »la prop. de kursfinitoj sekvigis kreon de kurso inter la skoltaro de Gv. Anonciĝis tuj 50 junuloj.« I. ŠIRJAEV.

Gvidfolioj, gvidlibroj. v. Turismo.

Gvidilo tra la Esperanto-Movado. Kompilis G. P. de Bruin. 1933, 48 p. La verko celas skizi en konciza formo bildon de la tuta E historio, movado, literaturo. Iom pli detala priskribo de la laborista E-movado.

Gvinevero kaj aliaj poemoj de Tennyson, el la angla trad. C. Bicknell, 1907, 57 p. »Bone, elegante, fidele B. tradukis kelkajn el la plej belaj poemoj de T.« (L I, 1909, p: 135.)

Gyges kaj lia Ringo. Versa tragedio en 5 aktoj de F. Hebbel, el la germana trad. Bennemann. 1916, 152 p. »Rakonto preskaŭ kruda de Herodotos, transformita al klasika literatura verko plej impresa. La traduko estas senriske komparebla kun la Z-a Ifigenio.« (G. S., »E', 1919, p: 61.)

Gyllsdorff (gülsdorf) Anna, svedino, artisto-metalĉizistino. Nask. 19 aŭg. 1887 en Laholm. E-isto de 1906. Gvidis kursojn, interpretis prelegantojn. Tradukis el la sveda. La solvo de la vivproblemo (broŝuro, 1930.)

Gysbreght van Aemstel. Tragedio en versoj de Vondel (mortis en 1679), el la nederlanda trad. J. R. G. Isbrücker. 1931, 82 p. »Ĝi temas pri sanga, pli legenda, ol historia

epizodo de l' nederlanda mezepoko. La traduko estis neordinare kuraĝa ago, ĉar la tasko estis ekstreme malfacila.« (Totsche, L M, 1932, p: 19.)



Haan J. de, nederlandano. Kunfondinto de la unua EG en Amsterdam, 1905. Red. de Amsterdama Pioniro kaj poste de Holanda Pioniro, 1908—09. Prop. kaj kursoj.

Haartman-Harteva v. Kaarlo Jalmari, (Kaarlo Harteva), finno, ing., direktoro de F-a oficejo de Int. Asocio de Bibliostudentoj kaj red. de ĝiaj organoj. E-lingvaj paroladoj en multaj urboj de Eŭropo, ankaŭ radio-paroladoj, kunlaboranto de La Ora Epoko, trad. religian verkon.

Haas (haz) aŭstro-germano, d-ro, advokato. Nask. en 1864 en Graz, mortis 30 jun. 1925 en Maribor (en Jugosl.). Unua pioniro de E en M., kie li fondis 13 sept. 1910 EK; prez. li estis ĝismorte. Laboris multe por E.

Habelok Georg, germano, fervoja eksinspektoro. Nask. 1 aŭg. 1880 en Breslau. Prez. de G Asocio de E Fervojistoj, 1919—26; afergvidanto de Silezia Ligo E-ista, 1923—26. De 1926 sekr. kaj de 1930 afergvidanto de GEA.

Habert (aber) Josefo, franco, ĉarpentisto. Nask. 30 sept. 1875 en Tours. Organizis kursojn por laboristoj en Pariza regiono 1910—14 kaj 1919—21. Fondis E-istan Sindikatan Fed.-n en Paris, 1912 kaj red. »Le Travailleur E-iste« 1912—14. Kunaŭtoro de franclingva lernolibro por laboristoj, 1921.

Hachette et Cie (aŝet é kompanji). Grava libroeldonejo en Paris, kiu estis varbita al E de Bourlet en 1901. La firmo en multegaj urboj de la mondo havis filiojn kaj korespondantojn kaj pro tio ĝiaj eldonaĵoj estis facile riceveblaj. La firmo havis kontrakton kun Z kaj tiel aperis en ĝia eldono

la fama Kolekto aprobita de d-ro Z (v.), la Kolekto de la Revuo, H. eldonis ankaŭ la gravan gazeton La Revuo, 1908—14. La firmo, ĉe kiuj montriĝis ankaŭ tendencoj por monopoli la tutan E-an libroeldonandon, post la milito likvidis sian E-an fakon.

Hackl (hakl) Karl, aŭstro-germano, iama kolonelo en Graz. Nask. 11 jan. 1870 en G. Posedas la plej altajn ordenojn por dumilita agado. Gvidis E-kursojn por la aŭstraj infanoj, kiuj sendis Stiria E-Unuiĝo en 1921 al Hispanujo, kondukis ilin tien kaj reen. Kursoj ĉe polico en Graz.

Haelker Hermann, germano. Nask. en 1873 en Bremen. Paroladoj, artikoloj, kursoj. Aŭtoro de la grava verko *Jarmiloj pasas*, universala historio, originale verkita en E, 1931.

Hageler Alf (antaŭa nomo: Johnsen), norvego. Nask. 24 jul. 1884 en Drammen, mortis 23 dec. 1932. E-iĝis en 1905 kaj kunlaboris kun la dana pioniro Skeel Giörling en la Societo de Danaj kaj Norvegaj E-istoj 1907. Gvidis kurson en Oslo 1907. Fondis E grupon en Drammen 1924. Artikoloj pri juraj temoj en »E' Genève.

Hago (den Haag). Loĝurbo de la reĝino de Nederlando; 443.000 loĝantoj. Pacpalaco. 12-a UK 9—15 aŭg. 1920, 408 partoprenantoj el 27 landoj. Decidoj pri nova organizado de Lingva Komitato, pri teknikaj vortaroj, pri komuna centro. — Samtempe okazis la 6-a Int. Katolika E Kongreso; fondo de IK. — Interreligia Konferenco por la Paco 31. jul.—2 aŭg. 1928. E estas sola traduka lingvo. — Int. Cseh-Instituto de E, fondita en 1930.

Hahn (han) Karl Walter, germano, lernejestro. Nask. 18 okt. 1882 en Tharandt. E-isto de 1908. Tre sukcesa propagandisto inter instruistoj kaj infanoj. Jam de 1909 li instruis E-n al infanoj en Schönau apud Chemnitz, Leipzig kaj Gohlis apud Dresden. Lia popollernejo en Gohlis estas la sola en G, kie E estas deviga instrufako. Sekr. de Saksia Instituto ĝis 1914 kaj prez. de E Asocio de Saksaj Geinstruistoj ĝis 1930. Multaj artikoloj pri E-aj kaj porpacaj temoj; samsence parolis ĉe int. kongresoj. Kunlaboranto de Int. P. ed. Revuo kaj de la G kongreslibroj. Verkis poemojn precipe por prop. inter infanoj.

Hainschegg (hajnŝeg) Adolf, aŭstro-germano, prof. mezlerneja en Graz. Nask. en 1883. E-isto de 1922. Lerta tradukanto, dufoje premiita dum Floraj Ludoj.

Hajami ŝinŝo, japano. Nask. 5 okt. 1875 en Maebasi-si. E-isto de 1906. De 1908 ĝis 1920 bonhumora prez. de Yokohama Filio de JEA. 1919 kun Takahaŝi, Hazama, Asai, Kodama k. a. fondis JE Komercan Korporacion en Y., kiu uzis E-n por importo. Pro paniko li dissolvis ĝin 1921 kaj donis ĝiajn nomon kaj proprajn al du el ili. La tertremo en 1923 ĉion detruis. Laŭ lia konstato, la klientoj korespondantaj en E estis fidindaj, eĉ se nericaĵ, dum tiuj en angla lingvo malfidelaj.

Hakansson (hokanson) Eskil, svedo, inĝeniero. Nask. en Lidingö. E-isto de 1901. Instruis E-n en Stockholm kaj Södertälje. Estinta estrarano de diversaj EG, del. de UEA.

Halász (halás) József, hungaro, ŝparkasa dir. Nask. 1874 en Gamás (Somogy), mortis 1928 en Marosvásárhely (nun Targumureŝ en Rumanujo). Socialisto, pacifisto, nobla gvidanto de socialaj kaj kulturaj societoj dum tri jardekoj en M. E-isto de 1915, fervora organizanto, subtenanto (ankaŭ materiale) de la E-movado en R. Kunlaboris kun A. Cseh kaj instigis lin pri pli vasta agado. Iniciatis kelkajn E-kongresojn en R.

Halbedl Adolf, aŭstro-germano, d-ro, advokato en Ried i. I. Nask. 30 majo 1893 en Spital sur Semmering.

E-isto de 1909. Reprez. diversajn int. E societojn. Estis prez. de AKLE kaj ES Peltier; iama estro de EG en Graz. Kunlaboranto de Espero K. A. tolrika, A. U. E-isto, E, H. D. E. Trad. Respondoj al kontraŭreligiaj paroloj de Ségur, 1925.

Halka Opero en 4 aktoj de S. Mo-niuszko, teksto de W. Wolski, el la pola trad. Grabowski. Populara teatraĵo en Pollando, ludita ankaŭ dum la UK en Krakovo, 1912. »La traduko montras ĉiujn bonajn kvalitojn de tiu ĉi eminenta verkanto.« (Käthe Jans, Germana E-isto, 1912, B. p: 30.)

Halka László, (ps. Parvus Piscis) hungaro, privatoficisto. Nask. 18 jul. 1905. E-isto de 1923. Eklaboris en la laborista E-movado. Instruas E-n de post 1924, precipe progresantojn. Verkis prop. artikolojn, faris paroladojn. Sekr. de HESL du jarojn. Depost 1930 aktivulo ankaŭ en HES; aranĝis lit. vesperojn. Kunlaboris al Hungara Heroldo, L. M., al Hungara Antologio (1932). Verkis artikolon pri Hodler por la Enciklopedio.

Hall Hilma Agatha Fredrika, finnino. Nask. 30 sept. 1854 en Kotka, mortis 3 jun. 1922. E-isto de 1906. Gvidis E studrondojn, agis kiel bibliotekistino en la societo »La Polustelo«. Tradukis la kvinaktan komedion La botistoj, la teatraĵojn La fianĝigo kaj Lea (ĉiujn de Kivi) finnajn proverbojn k. a. helpis multe al la verkado por la F-E Vortaro.

Halldor Albin Henning, svedo, ĝardenisto, redaktoro. Nask. 18 sept. 1892 en Sunne. E-isto de 1907. Estrarano kaj afergvidanto de Eldona Societo E. Sekr. de SEF 1922-27. Red. de La Espero 1921-27.

Hamleto, reĝido de Danujo. Tragedio de Shakespeare, el angla trad. Z. 1894, 136 p., 5-a eld. 1909, 176 p. Plej profunda kaj pensoriĉa dramo de S. La 71-a libro en E.

Hanauer Julius, germano, d-ro fil., bibliotekisto. Nask. 21 sept. 1872 en Mannheim. Estis unua vicprez. de GEA kaj hon. membro de la EG en Frankfurt a. M. Aŭtoro de anonima broŝuro Germanaj fremdvort-

radikoj en E. Elpensis metodon de instruado de E per izolitaj literaĵoj kaj silabaoj, montritan je unua fojo dum la UK en 1908. Poste li unuigis tiun ĉi metodon sur filmo (por starantaj projekcioj) kaj montrigis ilin dum la UK 1929. En la lastaj jaroj li proponis la prilaboron de int. vortaroj laŭ la decimala sistemo de klasigo (Melvil Dewey).

Hanbury (hanbri) Florence Harriet, angliano, red. de Kristana Revuo. Nask. 7 majo 1864 en Londono. Bibliotekisto. Verkoj kaj tradukoj en Himnaro E-a, Holanda Pioniro kaj K. R.: Dio, la Homaro kaj la Milito, 1916, Nova Pandoro, 1925.

Hankel Marie, germanino. Nask. 2 febr. 1844 en Schwerin, mortis 15 dec. 1929 en Dresden. En 1868 ŝi edziniĝis je universitata prof. H. Hankel en Tübingen kaj vivis en plej feliĉa edzeco kvin jarojn, post kio la edzo mortis. En 1903 lernis E-n kaj transloĝiĝante en Dresden-on, tute sin dediĉis al la movado. De 1909 ĝis la morto ĉiulunde ŝi gvidis la orientan grupon de la loka ES. Kunorganizanto de la UK en Dresden. »Reĝino« de la Int. Floraj Ludoj, en 1909, fond. kaj prez. de la E-ista Literatura Asocio. LK. Al ŝia plumo apartenas multaj versaĵoj en la E gazetaro. En apartaj eldonoj aperis ŝiaj verkoj: La simbolo de l' amo; kaj Sableroj (poezio kaj prozo). 1911. H. estas la unua E-poetino, portinta siajn modestajn sablerojn en la trezorujojn de la originala poezio. Ŝiaj poemoj respegulas amon kaj entuziasmon al la verda stelo, same atestas pri idealismo kaj meditemo.

HILDA DRESEN.

Hansen Holger, dano, instr. de lingvoj. Nask. 15 febr. 1893 en Odense. Kunfondo kaj prez. de EK en Holbæk. Arangiis en 1931 prop. vojaĝon de prof. Bujwid kaj en 1932 tiun de Elinjo Pähn. Estrarano de landaj ES-j; multaj kursoj, prop. paroladoj.

Hansen Knud Thorbjörn, dano, apotekisto. Nask. 23 jan. 1902 en Kopenhago E-isto de 1918. UEA-delo de 1921, de 1932 en Nörresundby. Edziĝis kun germana E-istino Hildgard Gerisch, Auerbach.

Harabagiu (harabaĝiu) Henriko, rumano, oficisto. Nask. 1906. E-isto de 1924. Sekr. de RES; organizis la rumanajn kongresojn.

Harrod James Tyler, anglo, lernejestro. Nask. 19 jan. 1870 en Hayes. Instruisto en kvakeraj lernejoj 1891—1930. Komencis E-an instruadon en Sibford-a lernejo, 1922. De 1931 sek. de la Kvakera E Asocio.

Harrod Mabel, angliano, instruistino. Nask. 20 jul. 1871 en Ackworth. Instruis en liceoj kaj gastlernejoj 1892—1930. Lerneja organizisto kaj prelegisto por la Ligo de Nacioj. Multe propagandas E-n.

Hartog (hartof) Johannes, nederlandano. Nask. 16 majo 1912 en Baarn. Okupas sin ĉefe pri filozofio kaj literaturo; provizore sen speciala profesio. Redaktas E-rubrikon en Baarn-a gazeto; artikoloj. Precipe okupas sin pri literaturo, lingvo-konstruo kaj historio de E. Studoj en HDE, Utreĉta E-isto, N-a E-isto.

Hartwich (hartviĥ) Ferdinand, aŭstro-germano, ing. Nask. en 1864, mortis 26 okt. 1926. Senlaca pioniro. Jam en 1907 vicprez. de UEU en Wien. Enkondukis E-kursojn ĉe blinduloj, verkis vortaron por ili en Braille-skribo. Gvidis por la aktoroj de la »Burgtheater« kurson por ebligi la prezentadon de Malŝparado de Raimund dum la 16-a UK. Gvidis la unuan Radiokurson ĉe Radio-Wien. Trad. de F. Raimund, Ganghofer k. a.

Harvey (harvi) George Brinton McClellan, usonano, red. kaj diplomato, posedanto de gravaj gazetoj. Nask. 16 febr. 1864 en Peacham (Vermont), mortis 26 aŭg. 1928 en Dublin (New Hampshire). Ambasadoro en Granda Britujo, 1921—23. Propagandis E-n en North American Review, 1906-08. Prez. de EANA, 1908—09.

Harvey (harvi) William, anglo, eksŝtatoficisto (en administrego de skotaj malliberejoj). Nask. 5 okt. 1860 en Coggeshall. LK. Estis sek. de la 18-a UK, prez. de Edinburgha ES (3-foje), prez. de Skota EF, dumlonge vicprez. kaj sek. de la Ekzamena Komitato de BEA, unu el la tri kompilitoj de la »Edinburgh«

Vortaro, tra legis presprovajjn de la Biblio en E, verkis artikolojn aŭ tradukojn por Lingvo Int., Literaturo, Heroldo, Int. Scienca Asocio, ktp. Faris multajn. prop. paroladojn.

Hasenöhrl (hazenörl) Arnold, aŭstro-germano, majoro pens. Nask. 1 dec. 1869 en Suceava (Bukovino, nun en Rumanujo). Dum 5½ jaroj militkaptito en Turkestano; tie li lernis E-n de kapitano J. Überla kaj faris multe por E ĝis 1920. Alveninte al la naskiĝurbo, ekagis por E inter la urbanoj »sed tio igis la homojn dubi je lia sana kompreno, pensigante, ke ĝi suferis dum la longa milito kaj kaptiteco, ĉar eĉ la vorto E estis tute nekonnata.« Tamen li gvidis plurajn kursojn, atingis diversajn sukcesojn, de 1923 ankaŭ en Cernauti. UEA-del. de 1921.

Hasegawa Riej, japano, prof. de int. privatlimleĝo en Imp. Univ. de Keizyo (Seoulo). Nask. 25 nov. 1899 en Tiba-ken. 1926 li vojaĝis en Eŭropon por studi sian specialan temon. En 1918 fondis E grupon kun aliaj en Unua Nacia Kolegio, Tokyo. Verkis E resumon de sia studo: int. privatlimleĝo en Soveta Rusujo, 1932.

Hawlik (havlik) Viktor, aŭstro-germano, komercministeria konsilanto. Nask. 28 jul. 1876 en Eberau (Burgenland), mortis 17 okt. 1931 en Wien. Jam antaŭmilita E-isto, unue en Praha. Estis vicprez. de IEMW.

Haxton (hakston) James T., skoto, spicisto. Nask. 3 aŭg. 1879 en Glasgow. Pioniro de E, kunfondinto de BEA.

Hayes Charles Frederic, anglo, librotenisto. Nask. 4 dec. 1857 en Blackheath, London. Lernis Volapükon. Helpis starigi la Londonan Klubon. Kunverkis kun d-ro J. C. O'Connor la unuan A-E Vortaron (1904). Trad. La Serĉado, (Hawthorne); La Parizaneto (Kron.)

Hayton (hejtn) George Markham, anglo, eksingenero. Nask. 8 majo 1874 en Niton, Wight. E-istiĝis en 1918. Kontrola ekzamenisto de BEA. Prez. de Sudmezlanda Fed., 1928. Sekr. de Sudorienta Fed. 1929—32. Kelkaj trad. en E gazetoj.

HEA: Hispana E-Asocio.

Hebreaj Rakontoj. De Salom-Alehem kaj Perec, et la hebrea trad. J. Muĉnik, 1923, 78 p. »Bone elektitaj eliraĵoj. Aparta originaleco. Ili elvekas ridon, simpation aŭ pripensadon. La traduko estas tute kontentiga.« (G. S., 'E' 1923. p. 44.)

Hechtl Jakob, germano. Nask. en 1872, mortis 30 aŭg. 1928 en München. Organizis la 4-an Tutaŭstrian E-Kongreson en Franzensbad, 1914, kaj iniciatis tie la unuan E-monumenton. Kunlaboris je »E«.

Heek Gerrit van, nederlandano, kontoristo. Nask. 12 aŭg. 1887 en Hengelo. E-isto de 1910. Terenoj de lia E laboro: komerco, lernejo, radio. Finance subtenis multajn gazetojn, organizojn kaj entreprenojn.

Hector Hodler, lia vivo kaj lia verko. 1928, 168 p. Enhavo: biografio verkita de Stettler; elekto el ĵurnal-artikoloj de H.

Heid (hajd) Alfred v. d., germano, preseja laboristo; proks. 50-jara. Aktiva prop-isto en laboristaj medioj (SAT). Sukcese laboris por E en Leipzig kaj Dortmund. Kontraŭstaris (malsukcese) kun Deubler la skismigon de la germana E-ista lab. movado en 1930.

Heikenwälder (hajkenveldr) Franĵisek, ĉeĥo, librotenisto en fabrikejo. Nask. 5 okt. 1898 en Kunvald. Prez. de la Prostějov-a EK.

Heiker (hejlkcr) P., nederlandano, lernejestro. Nask. 27 marto 1883 en Schiedam. LK de 1931. Estis prez. de NKEK kaj dum kelkaj jaroj red. de N Katoliko. Membro de la ekzamena komitato de 1917. Prez. kelkajn katolikajn E-kongresojn. Verkis lernolibrojn kaj eldonis libretojn enhavantajn parolajn ekzamenajn taskojn. Radio-kurso ĉe la katolika Radio-Disaŭdigo; ĉiudusemajne sciigoj en E antaŭ la mikrofono. Redaktas lingvorubrikon en N Katoliko.

Heilskov (hajlskaŭ) Christian Petersen, dano, bibliotekisto kaj verkisto. Nask. 6 apr. 1873 en Gerslev. E-isto de 1909. Samjare kunfondinto de Konversacia Klubo de Aarhus, kies prez. li fariĝis. Verkis gvidlibron pri Aarhus.

Heinze (hajnce) Willy, germano,

ŝtata elektroingeniero. Nask. 24 febr. 1889 en Netzkau. Kuntondinto kaj nuna prez. de la loka societo Lössnitz-ortschaften en Radebeul. Kas. de 1889 en Netzkau. Kurfondinto kaj de la Cseh-kursoj, gviditaj de ges-roj Morariu en 7 urboj de Saksujo, 1931.

Helsing Johan, svedo, kasisto en Gävle. Nask. 3 sept. 1867 en Dalekarlio. E-isto de 1906. Estis kas. de SEF, adm. kaj kunred. de *L a E s p e r o*. Gvidis multajn kursojn; instruis E-n kantante. Multajn jarojn la gvidanto de la movado en Gävle, kie estis la plej forta EG en la lando.

Helsinki. Ĉefurbo de Finnlando, 234.000 loĝantoj. — 14-a UK 9—15 aŭg. 1922, 820 kongresanoj el 30 landoj; grava kontrakto pri la organizo inter UEA kaj la naciaj societoj.

Hempel Helena, polino. Nask. 24 apr. 1846 en vilaĝo Ternovo apud Lublin. E-isto de 1899. (N-ro 4724 laŭ ZA.) En 1906 elektita al la unua estraro de P Societo Espero en Lvovo. Aktoris kaj reĝisoris kelkajn E teatraĵojn. Kunlaboris en multaj gazetoj, precipe en *P E i s t o*. Trifoje laŭdatino de Floraj Ludoj kaj aliaj Lit. Konkursoj.

Henderson George (ps. Hoinix), anglo, eldonisto. Mortis en 1911. Eldonis humoran gazeton »Phoenix« en simpligita latino, 1890—92. Elpensis lingvajn skemojn: »Linguae«, 1888, »Anglo-franca«, 1889, »Latinece«, 1901. Poste E-istiĝis kaj multe propagandis kaj verkis E-e. Eldonis *E folieton* kun enhavo laŭ la ĉefeca ŝlosilo, kiun li multjare reklamis en ĉiu numero de siaj gazetoj »Pictorial Comedy«, »Scraps«, k. a.

Hendriks Pieter, nederlandano, (friso), ĉefinstr. Nask. 22 nov. 1899 en Hindeloopen. E-isto de 1923. Gvidis la unuan kurson en la frisa ĉefurbo Leeuwarden kaj iniciatis fondon de unua grupo en 1926. Estas de tiu tempo la »motoro« de la E-movado en Frislando. Fondis plurajn grupojn, instruis E-n al pli ol 300 personoj. Por UEA varbis preskaŭ 100 anojn. Estrarano de LEEN.

Henriclundquist Gustaf, svedo, literaturisto. Nask. 1865 en Ystad, mortis nov. 1930 en Paris. Ĉirkaŭ 1890 li migris al Francujo, prenis al si la no-

mon Sébastien Voirol, vivis tie kiel franca verkisto. Tradukis en 1889 la unuan libron de Z al sveda lingvo; tiu estis la unua sveda lernolibro de E.

Henrique (enrik) Carlos, portugalo, mara ofiĉiro; prof. de komercaj lernejoj. Nask. 5 apr. 1894 en Porto. Laborkampo: PEA kaj UEA.

Hermano kaj Doroteo, eposo idilia de Goethe, el la germana trad. B. Küster, 1911, 86 p., dua eld. 1922. Unu el la ĉefverkoj de la mondliteraturo. »Küster certe mem pruviĝis poeto E-igante tiun verkon.« (El la Antaŭparolo de Dietterle.)

Heroldo de Esperanto. Unu el la plej gravaj gazetoj en E, semajna, ilustrita, internacia. HDE estas fondita en apr. 1920 sub titolo »E Triumfonta« de Teo Jung. Ĝi aperis de 20 nov. 1920 ĉiusemajne, de dec. 1924 ĝis fino de 1925 duonsemajne, dum la 15-a UK 1923 ĉiutage. La nomon HDE ĝi ricevis kun la unua n-ro de 1925. Formato: 46×30 cm, kun kelkfojaj ŝanĝetoj. Paĝonombro: 4—6—8—10. Abonantaro: 20 nov. 1920 ĉ. 500, 3 sept. 1922 2900, fine de 1924 2500, aŭtune 1928 1800, 1 jan. 1929 pli ol 2000, apr. 1930 ĉ. 2600. Ĝis aŭtuno 1928 HDE aperis en Horrem apud Köln, de tiam en Köln. Red., poste ĉefred. la fondinto kaj posedanto Teo Jung, respondeca red. J. F. Berger, anonca red. M. Wieland, kunlaboras multaj verkistoj kaj prop-istoj. Apud HDE aperis dum pli-malpli longa daŭro diversaj aldonoj, eĉ apartaj eldonaĵoj, kiel »Verda Stelo«. Nunaj regulaj aldonoj: Lingva Kritiko, monata revuo por lingvaj demandoj (kunlab. prof. Migliorini, La Colla ktp.); La Bela Mondo, monata paĝo por turismo ktp.; Nia Revueto, dumonata aldonon por junuloj; La Strigo, dumonata paĝo pri literaturo kaj arto; Humoro, Distro, Ludo, dumonata paĝo; La Anteno, radiopaĝo; Sur la kvin linioj, muzika paĝo; La Regno Virina, paĝo por virinoj. La kuraĝa iniciato — fondo kaj regula aperigo de semajna gazeto — signas memorindan fakton en la historio de E, kun speciala graveco por la postmilitaj jaroj. — En 1925 HDE fondis Librofakon, kiu eldonis i. a. du romanojn de Remarque, originalan historian verkon de Haefker, »Ĉir-

kaŭ la mondon kun la verda stelo« de Scherer, romanojn originalajn kaj tradukitajn, lernolibrojn ktp. La ĝis nun eldonitaj 64 diversgrandaj volumoj havas vendvaloron de ĉ. 140 sv. fr. HDE havas dekomence propran presejon; presejestro estas L. Goppel.

L. pluajn detalojn en la 500-a kaj 566 n-roj de HDE.

HES: Hungarlanda E-Societo.

HESL: Hungara E-ista Societo Laborista.

Hetzel Henry William, usonano, instruisto pri arto kaj mekanika desegnado en supera lernejo de Philadelphia. Nask. 29 marto 1872 en Ph. Eklernis E-n en 1906. Sekr. de E Asocio de Pennsylvania, 1910—13. Prez. de EANA de 1925. Oficiale reprezentis la ŝtaton Pennsylvania ĉe UK en 1912, 1914, 1930. Gvidis kursojn de 1907.

Hi'elismo. Soci-politika idearo, propagandita de Z, kiu ricevis sian nomon de la hebrea saĝulo Hillel, mortinta en Palestino komence de la unua jarcento. H. havas similajn celojn kiel **Homaranismo**. (v.)

Hill John Henry (Harrison Hill), anglo, muzikisto, organisto, humoristo. Nask. 5 febr. 1861 en Ashton-under-Lyne. E-isto de 1908. Verkis multe da kantoj, angle kaj E-e; inter ili *La Vera Frataro*, *Himno de Danko*, *Mia Juliet'*, *Esperanto*.

Himnaro Esperanta, kompilis M. C. Butler, 1910, 111 p., dua eld. 1921, 147 p. 211 poeziaj tekstoj uzablaj de ĉiu kristano dum diservoj.

Himno Esperantista. Ĝi konsistas el la vortoj de Z: *La Espero* — poemeto 24 versa kaj de la muziko de F. de Ménéil. La muziko estas tre marŝiga, veka. Iu kvazaŭ meza inter la Marseljezo kaj la Internacio. Sentigas en ĝi la franca temperamenta, malgraŭ ke la vortoj tute tion ne esprimas. Tiu himno, kiun ni nun konas kaj ne forlasas eĉ unu Kongreson sen ĝia kantado (kaj partoprenas en tiu kantado ne nur ĥoro, aŭ piano, aŭ orkestro, sed kutime la tuta ĉeestantaro), ne estas la sola muzikaĵo komponita por *La Espero*. Ĝi ankaŭ ne estas la unua. La unua, kiu komponis muzikon por

La Espero estis Cl. Adelsköld, membro de la Reĝa Akademio de Sciencoj en Stockholm. Li dediĉis ĝin al la Kongreso de la Paco en Roma en 1891 kaj disdonis je memoro al ĉiu kongresano. La januara numero de »*La Esperantisto*« 1892 ĝoje salutis tiun fakton kaj substrekis, ke tio estas »la unua originala muzika verko en nia lingvo.« Longan tempon tiu muziko estis la oficiala himno de E. Ankorau en 1903 Z en respondo al prof. R. Deshayes proponis (je ties proponita muziko por *La Espero*) prefere krei muzikon por *La Vojo*, por kiu ĝis nun »ankorau nenu faris muzikon« (Z plisatis »*La Vojo*«-n ol »*La Espero*«-n). Tamen ne unu ancorau komponaĵo estis kreita poste je la temo de la *Espero*. Multaj ankaŭ adaptis jam ekzistantajn melodiojn (Gavoton de Lullio), aliaj kreis diversajn melodiojn por ĥoroj, sol-kantoj, piano ktp. Dum la 1-a UK en 1905 estis proponitaj du himnoj: tiu de Adelsköld kaj tiu de Ménéil. Neniu el ili estis definitive akceptita kiel oficiala. La koncerna decido estis jena: »... la demando pri la universala himno estas prokrastata ĝis la venonta kongreso.« Tamen en la protokoloj de la 2-a UK nenio estas menciita pri la himno. Dum la 3-a UK okazas jam ia diskutado kaj estas akceptita, ke la »Kongreso konsilu al niaj Germanaj amikoj organizi, por la proksima Kongreso, feston en kiu oni ludos ĉiujn muzikojn, verkitajn sur »*La Espero*« de Z.« En la decidaro de la postaj UK-j nenio estas trovebla pri tiu materialo. Tiel do tradicie la muziko de Ménéil fariĝis la oficiala himno.

E. WIESENFELD.

Hindoĉinuĵo. Laŭ UEA-1928 la unua E-isto en Anamo estis J. Ferra en 1897, en Tonkino Lt. Prévost en 1900 (en Kuang-Jen). Pioniroj en Koŝinĉino: t-inoj Felicidad kaj Maria Paz Zamora (Saigon, 1902), prof. D. Venturini (Saigon) kaj prof. L. Barlet (Mytho, 1903) kaj M. Carrère (Giadinh, 1904). Laŭ la ICK-raporto 1929 »en Anamo franca kuracisto d-ro Domec klopodas sukcese eradikigi E-n. En la lando tre ofte la E-istoj estas eksterlandanoj, restantaj nur

dum certa tempo.« »En Anamo indigena gazeto favore akceptis prop. artikolojn.« (1930) La gazetoj »France-Indochine« kaj »Bao Dong Phap« publikigis artikolojn pri E, dank' al A. Guérineau en Vientiane.« (1931.) »Sub la gvidado de Guérineau en Hanoi fondiĝis EG en Tonkino (72 membroj). La grupo aranĝis kurson kun i. a. 47 anamlingvaj lernantoj, el kiuj 19 partoprenis en ekzameno pri lernado. La kurson faris Huynh-Ba-Duong.« (1933.) UEA-del. estis en 1933 en Hanoi. I. SİRJAĒV.

Hinduĵo, Brita. La ĉefa plantinto de E estis la fama angla prop-isto kolonelo John Pollen. Pro sia ofico ofte li vizitis tiun landon kaj varbis por E adeptojn el diversaj sociaj rondoj. La unuaj E-istoj estis Louis Peltier en Bombay en 1903, I. B. Banerjea en Calcutta kaj T. Adinarayana Chettiar en Salem en 1905, presinta 24 okt. la unuan artikolon pri E en »Indian Review«. Samjare aperis la unuaj E grupoj en Bombay kaj Udipli. En 1906, post E kunveno, aranĝita en Asiatic Society of Bengal«, oni fondis E grupon ankaŭ en Calcutta, kie A. Simper gvidis kursojn. Ankaŭ samjare oni fondis la gazeton La Pioniro en Marikappan kaj prop. artikoloj aperis en »Madras Times« kaj »Madras Mail« kaj la estrino de misiista kristana lernejo en Damoh s-ino I. Franclin enkondukis E-n kiel unu el la novaj lingvoj. En 1907 E grupoj troviĝis en Pengab: en Agra kaj Travancur, kaj la diversaj E grupoj unuiĝis en la societo »The E Association of India.« En 1914 oni ricevis informon pri la oficiala enkonduko de E en Supera Lernejo de Benares. La movado kreskis senhalte dum vivis ĝia inspiranto J. Pollen, sed post lia morto en 1923 haltis ĉio kaj laŭ la statistiko de Dietterle en 1928 eĉ unu EG ne ekzistis, nur izolaj E-istoj en 12 lokoj. »Simile kiel Eŭropo, H. kun sia multlingveco estas antaŭdestinita por prop. de E. Kvankam la hindustana kaj angla lingvoj tie jam plenumas la servon de helplingvoj, E havos sufiĉe da ŝancoj, tuj kiam ni povos prop-i E-n per hindlingvaj prop-iloj.« (ICK-raporto 1930.) »Nia speciala delegito,

s-ro Scherer, faris paroladojn en Rangun, Calcutta kaj Bombay, vizitis multajn redakciojn de indigenaj gazetoj. Bedaŭrinde la politika situacio absolute malfavoris publikan agadon dum la vojaĝo kaj plej granda retenemo estis necesa.« (1931.) »D-ro Privat, post reveno el H. (kien li akompanis Gandhi-on) skribis al ni, ke li faris paroladojn pri E en la Universitato de Delhi, en Benares ĉe la Hinda Univ., en Santiniketan kaj en Madraso. En diversaj lokoj fondiĝis rondoj por eklerni la lingvon.« (1932.) »Por longa tempo ankoraŭ H. restos malfacila, kvankam tre taŭga teritorio por nia laboro. Marin, okaze de vojaĝo, kiel antropologo, prop-is en Delhi, Agra kaj aliaj urboj. L. Sinha klopodis speciale en Bengalio, ankaŭ lia frato skribis en la gazetaro favore por E.« (1933.) UEA-del. estis dum 1933 en Bombay kaj Calcutta. I. SİRJAĒV.

Hinduĵo, Nederlanda: Javo, Borneo, Sumatra, ktp. La unuaj E-istoj estis L. Keidel en Kandang-Djati en 1902 kaj G. van der Noordaa en Soerabaja (Javo) en 1903. Laŭ la statistiko de Dietterle en 1928 E-istoj troviĝis en 22 lokoj. »Laboras tre laŭcele Liem Tjong Hie en Semarang. Dum sia misia vojaĝado pastro Kyftenbelt aranĝis instruadon por indigenoj.« (ICK-raporto 1929.) »Kreiĝis laboralianco sub la nomo Unuiĝo de GeE-istoj en N. H.« (1930.) »Dank' al la klopodoj de Scherer kaj la bonega helpo el Liem Tjong Hie unuan fojon okazis radio-paroladoj pri kaj en E en Javo.« (1931.) »Post sufiĉaj malfacilaĵoj kaj plurjara atendo, la malaja ŝlosilo estas disponebla; aŭtoro kaj eld. Liem Tjong Hie.« (1933.) UEA-del. en 12 lokoj.

Hipsley (hipsli) Frederic William, anglo, civila inĝeniero. Nask. 19 okt. 1876 en London. Dumviva membro de UEA. Iama sekr. de Birmingham ES, sekr. kaj poste prez. de Mezlanda EF.

Hirst (herst) William Henry, anglo, komercisto, instr. de sten. kaj E. Nask. 3 jul. 1880 en Huddersfield. Unua prez. de la tiea EG, 1908, kaj ofte de tiam sekr. aŭ prez.

Hirt und Sohn, Ferdinand, Leipzig, (v.) Ferdinand Hirt und Sohn.

Hispanujo. Antaŭ la ekapero de E ekzistis en H. movadeto pri aliaj publikistoj de int. lingvoj, nome, tiu de la hispano Sotos Ochando, klarigata en Ateneo de Madrid (proks. en 1863); Volapük, propagandita de madrida societo (Reina strato, 11), kiu gvidis kursojn kaj publikigis broŝurojn; k. c.

Unua parto: 1887—1905. Unuaj E-istoj estis en Malaga Jozefo Rodriguez Huertas, aŭtoro de la unua lernolibro por hispanoj (1890), kaj fondinto de la unua societo (1892); en Madrid Ramón Andreu Bella (1899), kiu gvidis kurson en Ateneo kaj publikigis gramatikon en »Revista de Taquigrafía y Fonetismo« (Revuo pri stenografio kaj fonetiko); lia lernanto Vicente Inglada Ors. (1899), tiam infanteria oficiro, kiu propagandis E-n unue en Madrid, poste en Barcelona (1902), kie li varbis la pionirojn Alfonso Sabadell kaj Francisko Ribot; en Murcia, Manuel Esteban (1901); en Santander, Andrés Bravo del Barrio (poste idisto), kiu publikigis E-n, unua gazeto en H. (1902). Ankaŭ estas citindaj Frederiko Pujulá, en Barcelona; staba subkolonelo Roman Ayza, infanteria kapitano Rafael Duyós Sedó kaj telegrafestro Fernando Soer Valls, en Valencia; kaj Manuel Monteagudo en Coruna.

La ĵurnalo respublikana »El Nuevo Régimen« (La nova reĝimo) publikigis artikolon subskribitan de Francisko Pi y Margall, prezidinto de la unua H. respubliko diskonigante E-n (Madrid, 29 jan. 1898) kaj semajna madrida revuo »Alrededor del Mundo« (Tra la mondo) publikigis favoran artikolon (22 marto 1900) kaj novaĵojn (22 nov. 1903).

Tiuj estis unuaj semistoj de E. La afero baldaŭ ekfuktigis, unuaj lokaj grupoj fondiĝis en Murcia (prez. Ricardo Codorniu, inĝeniero pri arbaroj), en Logrono (prez. Jozefo Baigorri Aguado, staba oficiro), en Valencia (prez. Aŭgusto Jiménez Loira) kaj en Madrid Bravo del Barrio starigis en societo »Fomento de las Artes« (progreso de la artoj) fakon titolitan »sekcio int. E-a«; en 1904 fondiĝis grupoj en Toledo kaj

aliaj urboj. Ankaŭ aperis novaj libroj: Ramón Andreu publikigis la unuan E-an hispanan vortaron (1899), Codorniu gramatikon (1903), Pastro Antonio Guinart gramatikon kaj vortaron (1903). Inglada altiris al E firmo Espasa de Barcelona, kiu subskribis kun firmo Hachette de Paris kontrakton por publikigi hispane la »Kolekto«-n (aprobita de Z), kies unua volumo aperis en marto 1904. Firmo Espasa publikigis ankaŭ gramatikon kaj Vortaron (du eldonoj) de Inglada kaj López Villanueva (marto 1904). Rafael Duyós kaj Inglada publikigis »Curso práctico de E.« (praktika kurso de E). Pri literaturaj estas menciinda »La jeso de la knabinoj« (trad. Maelean), kaj »La kuracisto per batoj« (trad. Inglada), ambaŭ teatraĵoj de Moratin.

Por unuigi la klopodojn de grupoj kaj E-istoj izolitaj oni starigis 1 febr. 1903 la H. societon por propagando de E (Valencia) kun la monata gazeto »La Suno H.« (okt. 1903) kiel oficiala gazeto.

2-a parto, 1905—14. Tiu epoko estas karakterizata de tre aktiva propagando kaj bona sukceso. Fondiĝis grupoj en Manresa (la unua de Katalunujo, 1905); Coruna (prez. Manuel Monteagudo, 1905); Bilbao (20 majo 1906) kaj S. Sebastián (prez. Julio Carrido, 1 nov. 1905) la unuaj de la Baska lando; S. Fernando (Cádiz, jan. 1907, prez. Jozefo Garzón Ruíz) kaj Gibraltaro (7 marto 1907), la unuaj de Andaluzio; Mahón (18 jul. 1907) kaj Palma (19 jul. 1907), la unuaj de Baleara insularo; Sta Cruz de Tenerife (prez. Juan Camberleng, marto 1907), la unua de Kanaria insularo; Santiago de Galicia (prez. Santaló, febr. 1906); Málaga (prez. Lano, jul. 1907); Alicante (prez. Miguel Elizácin, kavaleria subkolonelo, apr. 1907); Tarancón, Cartagena, ktp. En 1908 Emilio Gastón, Benitez kaj Montagud starigis en Zaragoza la unuan E-an societon de Aragon, »Fraterco« unu el plej viglaj de la lando.

Ĵurnalaro de multaj urboj (ĉefe Alicante, Barcelona, Bilbao, Coruna, Gerona, Jaen, Leon, Madrid, Malaga, Melilla, Murcia, Palma de Mallorca, Tenerife, Valencia, kaj Vigo) infor-

mis siajn legantojn pri tia movado. Fermo Espasa publikigis plejgravan H. enciklopedion (70 volumoj) kun traduko de ĉiu vorto en pluraj naciaj lingvoj kaj en E.

H. Societo preparis la 5-an int. Kongreson; du urboj petis akcepti la kongresanojn. S. Sebastián kaj Barcelona; en ĉi-lasta urbo ekzistis kelkaj grupoj kaj ĝi estis elektata por la kongreso, kiu sub la honora prezido de hispanaj gereĝoj, estis sukcesa (6—11 sept. 1909); aliĝis 1207 anoj el 32 landoj, kun 19 oficialaj senditoj regnaj. En Valencia profitante regionan ekspozicion, okazis postkongreso kun ĉeesto de Z. De tiam progresis multe E en Katalunlando, dank' al klopodoj de KEF.

En 1908 la E-istoj de Bilbao publikigis dum iuj monatoj litografite revuon »Bilbao E-ista«, kaj en 1910 »Nova Sento«-n.

En 1907 Bravo del Barrio, Codorniu, Redondo kaj aliaj starigis en Madrid »Centra E-ista Grupo« (prez. Jozefo Perogordo, artileria kapitano), kiu en 1909 publikigis monatan gazeton »H-a Revuo«, kiu nur vivis tri monatojn (jun.—aŭg.), kaj »El Esperantista« (duilingva). Sendepende de la grupo, Mangada, Linera kaj Redondo publikigis »Luz Espanola« (H-an Lumon) h-e kaj E-e, framasona monata revuo (marto 1911 — jan. 1912), al kiu sekvis »Homaro« tute en E (majo 1912 — jul. 1914). En 1911 fondiĝis en Madrid socialista grupo »Libera homo«.

En Cádiz Garzón Ruíz publikigis en 1910 (jan.—dec.) »Gazeto Andaluza«, unua E-a revuo de tiu regiono; tiu gazeto, post malapero de »La Suno H-a«, fariĝis oficiala organo de H. Asocio por propagando de E, kun la nomo Gazeto H-a (jan.—dec. 1911) kaj de jan. 1912 ludis tiun rolon »Nova Sento« de Bilbao. En 1913 reaperis »La Suno H.«

Krom lokaj bultenoj, estas citindaj gazetoj »Jen«, de Barcelona, sprita kaj bonstila revuo, »Kataluna E-isto«, oficiala organo de KEF, ankaŭ en Barcelona (ekde 1910), »La Korespondanto« (Valencia, 1911) kaj »Tutmonda Espero« (Barcelona).

Tri kuriozaj notoj de tiu periodo:

1-a, la 6 febr. 1906 oni elparolis unuafoje la vorton E en la h-a parlamento; tion faris deputito Leopoldo Romeo. 2-a, en 1910 Garzión Ruíz donis en Cádiz al sia junaskita filo la nomon E. 3-a, en Granda Teatro de Madrid oni ludis tute en E komedion de Vital Aza »Halto kaj gastoj« trad. de Redondo, okaze de festo organizita favore de kelneroĵ kaj hotelservistoj.

En 15 aŭg. 1911 ministra ordono permesis arangi kursojn de E en ĉiuj oficialaj lernejoj; sekve de tio, 1 okt. 1911 komenciĝis la unua kurso de E en la Centra Universitato de Madrid (Lingva Fako).

3-a parto. 1914—23. Kaŭze de la tutmonda milito, malgraŭ la neŭtraleco de H., E suferis malprogreson; plimultkostiĝo de la papero helpis malaperigon de ĉiuj E-aj gazetoj, escepte »Kataluna E-isto«; la cirkonstancoj ne estis taŭgaj por fari sukcesan propagandon, ĉar ĉiuj sin priokupis precipe pri la milito kaj ĝiaj sekvoj. KEF daŭrigis sian laboron, ankaŭ Vaska Federacio, kaj post malapero de H-a Societo, starigis en Madrid »Zamenhofs Federacio« por propagandi E-on en la ceteraj h-aj regionoj (1916). Ĝia oficiala organo estis »H-a E-isto«, revuo plej bela aperinta ĝis tiam en H., fondita de Mangada (Madrid jan. 1917, marto 1923; eld. Linera, S. Lucas 5). Lokaj grupoj klopodis konservi »La sanktan fajron« ĝis ia alveno de pli oportunaj tempoj. Oni starigis ankaŭ Hispanan E-Konfederacion sur la bazoj de Federacioj Kataluna, Aragona kaj Vaska; ĝi havis sian unuan kongreson en Reus (11—13 jun. 1916.) koincidente kun la VII-a Kongreso regiona de KEF.

En tia epoko de malvigliĝo de la movado, kelkaj pioniroj faris dank' al E citindan laboron. Kaŭze de la milito aŭstraj infanoj pereis aŭ suferadis pro malsato kaj malvarmo. Aŭstra E-isto Karlo Bartel petis helpon kaj E-istoj de la grupo »Frateco« de Zaragoza organizis ĝin. Sekvo de ilia klopodo estis la *gastigado en kelkaj h-aj urboj* (ĉefe Tarrasa, Zaragoza, Banolas, Oviedo, Barcelona, Sabadell, Cheste, Valencia, k. a.) de

326 infanoj, kiuj alvenis al Barcelona de 10 okt. 1920 ĝis 7 apr. 1921 kaj reiris sian landon de 21 jul. 1921 ĝis 24 apr. 1922. Estis gvidantoj de tiu bonfara laboro Emilio Gaston, de Zaragoza, (direktoro); Valentin Alavedra, de Tarrasa; Jozefo Casanovas, de Girona; Jozefo Serrat, de Barcelona; Francisko Mániz, de Cheste kaj Jacinto Comella, de Vich.

4-a parto 1923—33. Por unuigi ĉiujn E-istojn h-ajn oni starigis en 1925 Hispanan E-istan Asocion (HEA), formata de E-istoj izolaj kaj de tiuj apartenantaj al lokaj grupoj; tiuj siavice povas esti aliĝintaj senpere al HEA aŭ al regiona federacio, kaj la regiona federacio aliĝas al HEA; tiamaniere oni respektas individuajn kaj asocian liberecon. Plie ekzistas ankaŭ la antikva Hispana E-a Konfederacio, restarigita laŭleĝe 7 marto 1932 kaj formata de Federacioj Kataluna, Aragona, Asturia, Kanaria, kaj Levantina (Orient-hispana), la unua la plej grava. Ankaŭ ekzistas H-a E-ista Fervoĵista Konfederacio, aliĝinta al HEA. Nun oni laboras por kunigi tiujn tutlandajn asociojn kaj fari el ili unu asocion tuthispanan.

Krom la regionaj kongresoj organizitaj de KEF (la dekseca en Vendrell, dum la somero 1933 okazis naciaj kongresoj. Ne kalkulante tiun de Réus (jun. 1916) okazis tri nomataj »Diskutantaj kunvenoj de E-istoj de Iberaj landoj« en Barcelona (25—30 jun. 1920), Zaragoza (26—29 majo 1921) kaj Valencia (printempo de 1923). La IV-a okazinta en Bilbao jam estis nomata Kongreso. La V-a en Córdoba (10—12 majo 1925) petis kaj atingis, ke la registaro ordonu akcepti E-n kiel klara lingvo por la telegramoj. La VI-a (Madrid, jun. 1926) starigis H. E-Instituton, kiu, laŭ la regularo, konsistas el ne pli ol kvardek membroj. La VII-a okazis en Sevilla (5—9 nov. 1928) kun la honora prezido de la reĝo, kaj ankaŭ la VIII-a en Oviedo (14—18 sept. 1929) kun internacia ekspozicio de lernejoj laboraĵoj; la IX-a, estis la dua de Madrid (15—22 majo 1932), kaj la X-a en Santander (20—24 aŭg. 1933), kun la honora prezido de la

respublika prezidanto. Dum tiu kongreso oni donis la nomon de Z al strato de Santander; ja aliaj urboj havas kun tiu nomo placon, kiel Tarasa, aŭ straton, kiel S. Feliu de Guixols kaj Cheste kaj Barcelona (de 1931). En kongreso de Santander oni nomis komitaton (Fernando Soler, Luis R. Escartin kaj Manuel Vázquez) por starigi unu solan tuthispanan asocion, sur la bazo de la nunaj.

Oficiala organo de HEA estis unue »La Suno H.« (1926), poste »Hispana E« madrida revuo, fondita de Mangada (jan. 1928), kiu en apr. 1931 ŝanĝis sian nomon en »H-a E gazeto«, kaj Mangada cedis la revuon al HEA.

Kelkaj journaloj publikigis periode E-an rubrikon, kiel »Las Noticias« de Barcelona (1928). Aliaj publikigis informaron pri novaĵoj ĉiuspecaj publikigitaj en E-a gazetaro, kiel »La Libertad« kaj »Correo Eztremeno« de Badajoz (duonsemajne, 1928—30) kaj »La Última Hora« (ĉiusemajne, 1930—33) de Palma de Mallorca. Per Radio ankaŭ oni faris propagandon: Pastro Mariano Mejub disaŭdigis sep kursojn (Madrid, 1928—32).

Suplementa parto. Nun HEA konsistas el 740 membroj (prez. Julio Mangada) kun oficiala organo H. E-Gazeto, 16—32 paĝa, formato 20×14, ne estas abonebla sed oni disdonas ĝin senpage al HEA-anoj. Tiu asocio (sidejo Sagasta, 10, ĉe la Ruĝa Kruco) enkalkulas dudek grupojn kaj estas aliĝinta al ĝi H. E-ista Fervoĵista Konfederacio kun 300 membroj, multaj el ili estas ankaŭ HEA-anoj.

Hispana E-ista Konfederacio konsistas el federacioj Aragona, Asturia, Kanaria, Kataluna, kaj Orienthispana; dum 1932—33 la prezidanto estas ĉe la Aragona Federacio; en Zaragoza publikigas »Progreso E-ista« informa bulteno de la Konfederacio, 4-paĝa, 26×17.5, monata; en Barcelono »Kataluna E-isto«, dumonata, oficiala organo de KEF, 16-paĝa, 22×16. »Frateco«, plej grava grupo de Aragona Federacio, publikigas »Nia Vivo«-n, ankaŭ 4-paĝa kaj 26×17.5 kiel »Progreso E-ista«. Honora prez. de HEK estas Manuel Maynar, malnova

pioniro de E en Aragon. Prez. de HEK Jozefo Orós. Prez. de KEF Sebastian Alberich. Prez. de Orienthispana EF. Mihaelo Elizaicin. Prez. de Kanaria EF Viktor Ferraz.

Pri vortaroj, krom tiu de Inglada kaj Villanueva jam citita, kaj la »Universala Terminologio de la Arkitekturo« de Francisko Azorin, estas nenio nova. Ekzistas bonaj gramatikoj, nome, tiuj de Inglada kaj Du-yós, jam cititaj, tiuj de Fernando Soler, Jozefo Anglada, Bremon, Inglada (filo), Mangada, Garzón Ruíz, ktp. Pri literaturaroj ni povas citi la verkojn (originalaj kaj tradukitaj) de Inglada (patro), versaĵoj de Rafael de S. Millán, kaj verkaro de Julio Mangada. Baldaŭ aperos *H-A Antologio de Jaume Grau*, aŭtoro de *Kataluna Antologio*.

F. REDONDO.

Katalunujo. La lulilo de E estis la ĉefurbo Barcelona, kvankam la unuaj E-istoj aperis en proksimaj K-aj urbetoj. Barcelona, ĝiaj najbaraj urboj Sabadell, Terrassa kaj Manresa ĉiam liveris al la nacia E-movado la plej grandan nombron de batalantoj kaj pioniroj. La movadon nutris du grandaj kaj romantikaj idealoj, kiuj ofte konvulsie subkuias la ordon rantan en tiu tempo: proletoj kaj katalun-naciistoj. Ambaŭ trovis en la alpeno de lingvo int. partan solvon de iliaj idealistaj sapiroj. La proletoj vidis en E la plej praktikan solvon por la starigo de solida interrilato kun samklasaj eksterlandanoj.

La direktado de la movado ĉiam estis en la manoj de tiuj personoj, kiuj en la ne-E-a vivo estis sentemaj patriotoj, kaj ilia agado en la E-ista kampo estis vole-nevole iom saturita de iliaj patriotiaj kredoj, kiuj forte akcentiĝis, kiam iu afero ektuŝis la prilingvan demandon. K-a lingvo la unua, E la dua lingvo por ĉiuj, estis ambaŭ esprimoj, kiuj pulsas en iliaj koroj kaj elfluis el iliaj lipoj. La hispana lingvo oficiala kaj deviga lingvo en tiu tempo estis sisteme flankenlasata. Egale okazis ĉe la tiam ekzistantaj E-organizaĵoj »Espero K-a kaj KEF, kiuj ĉiam zorge konservis sian sendependecon kaj rekte interrilatis kun la Centra Oficejo de Paris.

Antaŭ 1900. La ideo pri lingvoj universalaj interesis en ĉiuj tempoj multajn eminentulojn K-ajn, el kiuj elstaras, pro iliaj projektitaj sistemoj, Ramon Luljo, famkonata filozofo de la XIII-a jarcento, kaj Sinibald de Mas, aŭtoro de atentinda pazigrafio en 1863. Ankaŭ en 1833, la poeto de la K-a literatura renaskiĝo, Bonaventura Carles Aribau pledis pri alpeno de lingvo universalala.

En la lastaj jaroj de la pasinta jarcento apenaŭ ekzistis E-istoj en K. La malmultaj volapukistoj, kiujn enkalkulis K., aŭ tute forlasis sian aferon, aŭ nur tre malfrue aliĝis al E. Ekz. d-ro Josep Buxó el Montcada nur ĝis 1903 enviciĝis al E, eble kiam jam ne plu ekzistis al Volapuk espero pri savo.

La unua E-isto en K. certe estis Josep Vidal Llopert el Vilanova i Geltrú, kiu skribis diversajn artikolojn en E por gazeto »Esperanto« aperinta en Santander. Krom tio, li fondis ronueton E-istan en sia naskiĝloko, kie li mortis en 1905, transdoninte sian E-bibliotekon al la tiea »Biblioteca-Museu Ba'guer.« Ekzistis en tiuj komencaj tempoj ankaŭ diversaj pastroj, kiuj konis E-n, sed iliajn nomojn oni trovas nenie, kvankam ili faris meritan taskon en siaj rondoj, precipe en la ordeno skolapiuloj (Escoles Pies).

Unuaj tempoj (1900—07). En dec. 1901 aperis la sola persono, kiu donis efektivan puŝon al E: Alfons Sabadell el Barcelona. Li fariĝis E-isto pere de Almanako de librejo Hachette el Paris, en kies paĝoj aperis kurso de E. Li tuj sentis sin kaptita, ne nur de la facileco de la lingvo, sed de ĝia enblovita »interna ideo«, kiu liveris al li ĉiujn konvinkajn argumentojn por altiri novajn simpatiantojn, inter kiuj troviĝis Vicente Inglada, staba kapitano kiu, loĝante tiam en K., multe helpis al la disvastigo de E. Baldaŭ ĉiuj simpatiantoj kuniĝis kaj fondis la unuan grupon en K. (1903?), kies prez. fariĝis Sabadell; kunlaboris Inglada, Ribot, Gonzalez de Escadón kaj aliaj, plejparte el ili militistoj. Oni aperigis artikolojn pri E en diversaj K-aj gazetoj, kaj iom post iom la unuaj

semoj fruktiĝis en Sabadell, Terrassa, Manresa, Figueras, Igualada, Vilanova, Cardona kaj aliaj ne tiom gravaj urbetoj.

La nova grupo preparis la unuan publikan kurson. Inglada estis gvidanto de 25 partoprenantoj, en unu ĉambro de »Acadèmia de Taquigrafia«, ĉe strato Portaferriŝa. Post tiu kurso la grupo akiris freŝajn fortojn, inter kiuj rimarkinde laboris Rosals kaj d-ro Bremon. Sed jam de la komenco ekestis disputoj inter la grupanoj, pro la klarigado de la kursoj en hispana lingvo anstataŭ en kataluna. Por eviti disfalon de la grupo, Sabadell kreis novan grupon por la nekontentuloj kun la nomo »Verda Ĉambro«, sed ĝi malaperis post mallonga tempo.

Intertempe fondiĝis novaj grupoj en Manresa kaj Cardona, kaj novaj batalantoj aperis en multaj K-aj urbetoj, en ilia plejnombro pastroj. La kvanto de K-aj E-istoj en tiu frua tempo (dec. 1903) atingis apenaŭ la nombron 100.

En la lastaj monatoj de 1904 aperis nova pioniro, Paul Berthelot, kiu sentis fortan simpatian al la tiutempa katalun-naciista movado kaj faris multajn klopodojn por arigi la K-ajn E-istojn ĉu apartenantajn al la franca aŭ hispana ŝtatoj. En dec. 1904 li starigis en Ceret (Fran.), la urbo kie li loĝis, la Ligon kun la nomo »Aplec E-ista de Catalunya«. Sekvis tiun fondon la apero de ĝia organo »Espero de Katalunujo« (aperis nur trifoj), la unua E-ista gazeto aperanta en K. Tiu »Aplec« baldaŭ enkalkulis 100 membrojn, dissemitajn en ambaŭ flankoj de la Pirenea montaro. Deleĝitoj en Barcelona, Perpinyà, Manresa, Cardona, Beziers, Ceret, k. a. komencis labori por la nova landa societo, kiu jam anoncis por la pentekostode de 1905 sian unuan ĝeneralan kunvenon aĵ kongreseton en Barcelona. Dudek francoj veturis al Barcelona, inter kiuj, krom Berthelot, troviĝis E. Boirac, Th. Cart, f-ino Jeanne Florence, k. a. Tiu kunveno ne vekis ian intereson ekster la ne E-ista publiko, ĉar ĉiuj kunvenoj kaj festoj okazis tre intime inter ili. En societo »Esquerria de l'Eixample« oni okaz-

igis literaturan feston, kiu konsistis el deklamoj, kantoj, paroladoj en franca, hispana, kataluna kaj E-a lingvoj, kaj fine oni reprezentis komedieton de Meyer »La Supujo«, tradukita de Berthelot. Vespere, kiel kunfrata adiaŭno, oni aranĝis festenon en la restoracio »Maison Dorée«, kie regis entuziasmo kaj amikeco inter la E-istoj, apartenantaj al tri nacioj: francoj, hispanoj kaj katalunoj.

Kelkajn monatojn poste okazis en Boulogne-sur-Mer la unua Int. Kongreso (1905), K. havis sian reprezentanton en tiu kongreso Sabadell, kiu revenis en sian urbon kun kapo ŝtopita de novaj ideoj kaj propagandplanoj, kaj preta rakonti siajn impresojn al siaj kamaradoj.

Intertempe en Barcelona unu el la novaj varbitoj de Sabadell faris rimarkindan propagandon por E de la kolonoj de la revuo »Joventut«, organo de la katalun-naciista movado. La redaktoro de tiu revuo, konata verkisto kaj unu el la tiamaj gvidantoj de la naciista movado, Frederic Pujolà i Vallés, fariĝis fervora E-isto kaj li direktis la propagandon grandparte en la naciistajn mediojn. Al paroladoj, malfermo de E-istaj rubrikoj en multaj gazetoj, artikoloj, ktp. estas prefere dediĉata lia tuta laboro. Du monatojn post la kongreso de B-s-M. li malfermis kurson en la naciista societo »Progrés«, antaŭ multa ĉeestantaro. Sed la 25 nov. de 1905 okazis kontraŭka' aluna ribe' o de hispanaj militistoj kaj ĉiuj naciistaj gazetoj kaj societoj estis malpermesataj. La kurso en »Progrés« ĉesis, Pujolà devis forkuri en Francujon kaj resti en ekzilo dum kelkaj jaroj.

Malgraŭ tiuj subi'aj malagrablaĵoj, unu monaton (dec.) post lia foriro, estis fondata la unua serioza societo E-ista, kiu rapide etendas siajn radikojn tra la tuta lando: »Espero K-a«, kiu dum 1905-07 disvolvis grandan propagandon. Pujolà (kvazaŭ patro de tiu societo), daŭrigis sian laboradon el sia ekzilo mem. Aperis artikoloj kaj E-rubrikoj en diversaj ĵurnaloj, kaj li ankaŭ finpretigis la unuan E-gramatikon en K-a lingvo.

En multaj urboj, urbetoj kaj vilaĝoj fondiĝis novaj grupoj, kies inaŭ-

guran feston partoprenis, en ilia plejmulto, kelkaj pioniroj de »Espero K-a«, doninte tiamaniere pli altan reliefon al la fondo.

Antaŭ-milita epoko (1908—14). En jan. 1908 aperis »Tutmonda Espero«, organo de la societo »Espero K-a«, gazeto kiu de l'unua momento kunligis ĉiujn K-ajn E-istojn; ĝi aperis ĉiumonate ĝis fino de 1914, en formato 20/25, 16-paĝa kaj ĝi estis unu el la plej gravaj en la tiama E-ista gazetaro, ne nur pro ĝiaj direktantoj, sed pro la abunda literaturo kaj lingvaĵo uzata. En tiu sama jaro aperis ses numeroj de scienca kaj arta revuo nomata »Stelo Kataluna« kaj eldonita en urbo Igualda. Ankaŭ aperis kelkaj E-gramatikoj en K-a kaj H-a lingvoj, tradukoj de la K-a aŭtoro Santiago Rossinyol faritaj de Sabadell kaj vortaro E-K prilaborita de Pujolà, kiu nur en junio de tiu jaro povis reveni el sia ekzilo de Paris.

La akcepto de Barcelona kiel urbo por la V-a UK en 1909 vekis grandan entuziasmon inter la K-a E-istaro. Preskaŭ 50 kursoj okazis en la komenco de 1909 nur en Barcelona. En la resto de la lando, novaj grupoj kaj novaj gazetoj (tamen kun tre efemera ekzisto) aperis en ĉiu loko. »Kataluna Nacio«, naciista gazeto; »Supren!«, ankaŭ naciista gazeto; »Tutmonda Sonorilo«, ilustrita; »Jen«, humora; kaj diversaj grupaj bultenoj estas eldonitaj dum tiu jaro. La UK okazis kun granda sukceso, malgraŭ la malbona politika situacio, kiu ekregis en Barcelona unu monaton antaŭ la UK. Inter la diversaj festoj, ekskursoj, ktp. okazintaj, elstaris la festo de la Floraj Ludoj, kiu multe impresis la eksterlandajn E-istojn. Z ricevis de la tiama reĝo Alfonso XIII, la honoran titolon de Komandoro de la Ordeno de »Isabel la Katòlica«, kaj Sabadell en sia privata hejmo gravurigis la voĉon de la Majstro, Bourlet, Grabowski, de Mènil kaj aliaj konataj pioniroj sur vaksajn malnovajn fonografcilindrojn. Tiuj cilindroj estas ankoraŭ konservataj, kaj en 1931 KEF reproduktis en modernajn gramofondiskojn la voĉon de Z. Resume: la V-a Kongr. estis la kon-

struo de solida bazo, sur kiun sin apogis ĝis 1914 la tuta K-a E-movado, kiu en tiuj tempoj estis unu el la plej rimarkindaj en Eŭropo.

Jam en 1908 oni faris diversajn esplorojn kun la celo starigi tutlandan Federacion de E-istoj, sed la ekzisto de la societo »Espero K-a« estis por multaj personoj sufiĉe kontentiga organizado, kvankam aliaj kontraŭdiris, ke tiu societo nur kunligis la Barcelonajn E-istojn, sed ĝi ne zorgis pri la ceteraj K-aj E-istoj. Fine en la komenco de 1910 oni fondis la unuan tutlandan organizaĵon: »Kataluna E-ista Federacio«, (KEF), kies unua kongreso okazis en Sabadell en majo de la sama jaro. Tuj oni aperigis la presorganon »K-a E-isto«, sub la gvido de Domènec Sardà el Sabadell, kies laboroj por la starigo de tiu Federacio merite donis al li la nomon de »la patro de KEF«. Ankaŭ li meritas tiun ĉi titolon rilate la starigon de la Int. Floraj Ludoj, ĉar dum la unua kongr. de KEF en Sabadell li proponis ilian okazigon dum la venonta Kongreso en Tarragona. (Tiu valora pioniro mortis unu monaton antaŭ tiu kongreso.)

Dum tiu jaro aperis kelkaj libroj el la verkoj de la dramisto S. Rossinyol, traŭkigitaj de Sabadell, du komedietoj en E de M. Cases, diversaj grupaj bultenoj, la duonmonata gazeto hektogratita »Fulmo«, sub la gvido de F. Sabaté kaj »K-a Katoliko«, organo dum 8 jaroj de »K-a Ligo de Katolikaj E-istoj«.

La movado konservis ankoraŭ la impulson donitan de la UK en Barcelona, aperis kaj malaperis novaj grupoj kaj gazetoj en diversaj partoj de la lando. Nur en Barcelona daŭris la regula aperado de »Tutmonda Espero« kaj en Sabadell la presorgano de KEF, »K-a E-isto«, nun sub la zorgo de Pujolà, kiu prenis ĝian direktadon post la morto de Sardà.

Nun la tutan atenton aliris al si la nova tutlanda Federacio, kiu ĉiujare organizis landan kongreson kaj la respektivajn Florajn Ludojn. KEF arigis apud si 50 el la ekzistantaj grupoj en K.

Brile okazis kongresoj kaj Floraj Ludoj en Tarragona (1911), Terrassa

(1912), Olot (1913), kaj St. Feliu de Guixols (1914). Ankaŭ dum tiuj jaroj okazis en kelkaj urbetoj de la provincoj Girona kaj Tarragona rimarkindaj E-istaj tagoj okaze de la ĝeneralaj kunvenoj de la provincaj Ligoj. Intertempe, la 27 jul. 1911, la hispana registaro dekretis reĝan ordonon, kiu permesis la instruadon de E en ĉiuj ŝtataj lernejoj kaj Universitatoj.

La granda milito, kiel en aliaj landoj, kaŭzis al la K-a movado ankaŭ malbonsortan baton. Pli ol 50 E-istoj K-aj veturis al Paris por partopreni la kongreson, kiu ne okazis. Inter la karavano estis la K-a trupo de aktoroj, kiuj dum la UK en Barcelona reprezentis en K. la dramon de la K-a aŭtoro Adrià Gual »Mistero de Doloro«. Ili estis speciale kontraktitaj por reprezenti en tiu Kongr. la komedion de Molière »Georgo Dandin«. Ĉiuj anoj de la karavano revenis krom Pujolà, kiu, preninte dum sia ekzilo la francan civitaneco por eviti politikan persekutadon de la hispana ŝtato, estis mobilizita de la franca armeo. La movado mem malkreskis. »Tutmonda Espero«, kiu seninterrompe aperis dum ses jaroj ne plu estis publikigata. »K-a E-isto« dum la lastaj ses monatoj de 1914 aperis nur unufoje.

Milita kaj post-milita epoko (1915—21). Malgraŭ la forta senkuraĝiĝo sentebla en la vicjoj de la E-istaro, la pioniroj klopodis persvadi siajn kunlaborantojn pri la efemera vivkapablo de la milito. Nur tiamaniere oni povis konvinki la skeptikulojn pri la bezono konservi en neŭtrala lando la plej eblan E-istan fajron neestingeban, kiu poste taŭgos por reflamigi la cindrojn restintajn en la resto de E-ista mondo.

En 1915 dir. de »K-a E-isto«, fariĝis Josep Grau Casas. Tiu ĉi presorgano aperis regule dum 1915, kun kelkaj interrompoj dum 1916, kaj unu sola numero (kiu sciigis pri la morto de Z) en 1917. KEF sukcese ankoraŭ organizis kongreson kaj Florajn Ludojn en Vilanova i Geltrú (1915), kaj sekvontan jaron en Reus. Dum 1918, 1919 kaj 1920 KE ne aperas, kaj ĝin anstataŭas, en malsamaj aranĝoj kaj formato, »Bulteno de KEF«, sub la

direktado de Marian Solà el Terrassa. En la daŭro de tiuj tri jaroj, la tuta afero pri KEF estas sub la zorgo de la E-istoj el Sabadell kaj Terrassa, kiuj ankoraŭ kuraĝis sukcese organizi unu Kongreson kaj Florajn Ludojn en Manlleu dum 1919.

De 1921 ĝis la hodiaŭaj tagoj. Joan Gili Norta, reveninte de la UK en Hago en Barcelonon, konvinkis sian amikon Jaume Grau Casas (kiu tiam estis sekr. de KEF) pri la nepra bezono revigligi la tutan K-an movadon, kaj en la unua momento, kiel plej facile alirebla vojo, revigligi la tutan entreprenon pri KEF. Du monatojn poste KEF alvokis al ĝenerala kunveno, en kiu oni decidis reaperigi la presorganon KE kaj aranĝi landan kongreson kun la tradiciaj Int. Floraj Ludoj. De post tiu tempo la movado estas denove solidigita, ĉar la presorgano (nun sub la zorgo de Jaume Grau) regule kaj ĉiumonate aperas, E-kursoj grandnombre funkcias kaj oni okazigas sukcesplenajn kongresojn kaj brilajn Florajn Ludojn. Dum tiuj ĉi 13 jaroj (1921—1933) la direktilo de la KEF-ŝipo iris de manoj al manoj de lertaj kaj fervoraj pioniroj, kelkaj antaŭe aliaj post-militaj E-istoj: Gili, Grau, Dalmau, Alberich, Solà kaj aliaj, kiuj efike helpis.

Malgraŭ la malfacila politika situacio, kiu ekzistis dum sep jaroj (militista diktatoreco de 1923 ĝis 1930, persekuto kaj malpermeso de proletaj, katalun-naciistaj, kunulaj k. a. movadoj) oni bone sukcesis aranĝi kaj okazigi kelkajn landajn kongresojn kaj Florajn Ludojn en Girona (1921), Manresa (1923), Vic (1924), Palma de Mallorca (1925), St. Coloma de Farnés (1926), Soller (1927) kaj Vinaroc (1928). Sed en tiaj specaj diktatorecaj reĝimoj oni celas ekstermi eĉ la kulturajn societojn plej fremdajn al la politika movado. Ne mankis, do, persekuto por KEF, kiun oni akuzis pro ĝia separatista agado kontraŭ la hispana ŝtato. Kaŭzoj de tiu persekuto: la simpatio aldirita por K. pere de eldono de »K-a Antologio«, la sistema flankenlasado de la hispana lingvo sur la paĝoj de »K-a E-isto«, la neaparteno al HEA,

la persisto saluti la UK-jn en la nomo de la katalunoj, la rekta interrilato kun la int. E-organizaĝoj, kaj aliaj. Konsekvencoj de tiu persekutado: monpuno 500-peseta pro artikolo aperinta en KE en 1925, starigo de malfacilaĵoj antaŭ la preparado de la kongresoj, kaj aliaj. Ekz. generalo, kiu regis Barcelonon en 1928, postulis de KEF, ke »ĝi en la estonteco ne nomu ŝin plu Kataluna kaj aliĝu al la H-a Federacio, efikante tiamaniere la interfratiĝon kun la ceteraj H-aj regionoj«. Sed la KEF-anoj, antaŭ ol akcepti similan submetiĝon, preferis en Vinaroz (kongresurbo en 1928), forlasi la subtenadon de KEF kaj atendi ĝis kiam: la cirkonstancoj estos pli favoraj. Tiuj favoraj momentoj alvenis en la komenco de 1930, tri monatojn post la forigo de la diktatoreca reĝimo. Denove estas starigitaj en aŭg. 1930 la regularoj de la tradicia KEF, reaperis la presorgano KE, tuj poste sekvis dua eldono de »K-a Antologio«, reprodukto de la voĉo de Z sur modernaj gramofondiskoj, inaŭguro de Z-stratigoj en Barce'ona, Vic, Cassà, Vendrell, eldono de propagandfolioj, de elementa grama iko en K-a lingvo, okazigo de Ce-kursoj dum tuta jaro (1933), XVI-a Kongreso kaj Floraj Ludoj kun sukceso en Vendel (1933), ktp.

La movado en K, post la starigo de la Respubliko, rapide kreskas, precipe en la proletaj medioj, el kiuj naskiĝis kelkaj novaj grupoj kaj unu Ligo, kiu eldonas propran bultenon nomatan »Proleta Voĉo«. KEF iom post iom reakiras la terenon perditan pro la diktatoreca reĝimo.

E. CAPDEVILA.

Rimarko kontraŭdira. Dum 1929—30, post la forlaso de KEF ĉe la Kongreso en Vinaroz pro politikaj cirkonstancoj, kelkaj senpartiaj kaj sindonemaj E-istoj, sub prezido de Angelo Valdepenas, entreprenis la malfacilan taskon restarigi KEF, kion ili faris sub la nomo Katalun-Baleara E-ista Federacio, (KBEF). (Kataluna E-isto, 1929—1930, n-roj 1 ĝis 9). Tio estis neŭtrala E-ista agado, kiu kreis novan generacion post la malvarmigo de la malnovaj pioniroj, kaj kiu kul-

minaciis kun la 16-a Kongreso de KBEF (19—20 apr. 1930), honore prezidita de A. Sabadell. Tiam estis okazintaj politikaj ŝanĝoj en Hispanujo, kaj la naciemaj katalunaj E-istoj sukcesis forpeli la senpolitikajn katalunajn E-istojn, kiuj dum tiu periodo restarigis kaj regis KEF.

J. ANGLADA.

Noto. Specialan dankon meritas Juan Barcelo Andreu (Palma de Mallorca), kiu — post daŭraj sed vanaj klopodoj akiri artikolon pri Hispanujo — insistis, ke tiu artikolo estu tamen ricevita. (R e d.)

Historieto de Esperanto. De A. Fiŝer. 1911, 48 p. »La be'la studo perfekte plenumis la malfacilan taskon, resumi en broŝuro la tutan historion de nia lingvo.« (LI, 1912, p. 38.)

Historio de Esperanto. De Z a k r z e w s k i. 1913, 144 p. »Loĝante en Varsovio, en la naskejo mem de E, li havis sub la mano ĉiujn necesajn dokumentojn, el kiuj kelkaj estas eĉ netroveblaj aliloke; li povis ricevi de la buŝo mem de nia Majstro multajn sciigojn kaj rememorojn nenie skribitajn. El tio rezultas la graveco de la nuna libro kiel kolekto de faktoj; ... li nur raportis pri la okazaj laŭ kronologia ordo, ne serĉante eltiri el la faktoj iun ajn konkludon... Neologisma tendenco de la aŭtoro.« (Ned Katryn, LI, 1914, p. 109.)

Historio de Esperanto. De Brüg-gemann. 1923, 160 p. Okupas sin precipe pri la I—VIII. UK-j, prezentas ĉiujn kongresparoladojn de Z.

Historio de Kris.o. De Papini, trad. el la itala anonimulo, 1931, 575 p. »Post antaŭparolo, kun akraj paroloj al nekredantoj, venas multnombraj ĉapitroj, pli ol cent, kiuj ja sekvas tempe la konatajn faktojn de l' Biblio, sed kiuj parafraze ilin klarigas por eltiri religian aŭ moralan lecionon.« (G. S., »E«, 1932, p. 13.)

Historio de la lingvo Esperanto. Verkita de Privat. I. parto: Deveno kaj komenco, 1887—1900. 1912, dua eld. 1923, 74 p. — II. parto: La movado, 1900—27. 1927, 199 p. »Tiu ĉi verko estas pli, ol historia datkolekto, ĝi estas vere, la estinta, sed »estantigita« vivo de nia movado. La homoj, ideoj, formoj vivas en ĝi

kaj la tuta libro estas freŝa, kiel la naturo. Belega stilo!» (Szilágyi, LM. 1931, p: 16.) La ĉapitro: »E dum la milito« represas laŭvorte en la Enciklopedio.

Historio de la Mondlingvo. Tri jarcentoj da serĉado. Verkis E. Drezzen, eld. Ekrelo, 1931, 244 p. »Post Histoire de la langue universelle de Couturat kaj Leau, ni ne havis tian kompendion. Finaj listoj, kun fontlibroj, nomaroj de P cititaj personoj kaj de P preparolitaj lingvoj, kiel ankaŭ la marginaj titoloj tre faciligas serĉadon en la tre ampleksa enhavo. La tuta serio de P malnovaj strangaj proponoj, pasigrafioj, skrib- aŭ simbolaj lingvoj, renovigoj de la latino, kalejdoskope pasas antaŭ la leganto. Por la unuaj periodoj, la ordo estas tiu de P jaroj; por la lastaj, ni havas paralelajn ĉapitrojn pri la diversaj nuntempaj direktoj en la serĉado al mondlingvo. La verko ne nur estas per la liveritaj faktoj, referencoj, tabeloj, tre taŭga laborilo por studemuloj ĉe tiu fako, sed per konsideroj, juĝoj de P aŭtoro, per detalaj ĉapitroj pri Volapük, E, Ido, per la aldonitaj portretoj, montroj de strangaj alfabetoj, ekzemploj pri malmulte konataj projektoj, per la ĝeneraltemaj ĉapitroj, ĝi fariĝis ankaŭ verko leginda de ĉiu samideano.« (G. S., 'E' 1932, p: 106.)

Historio kaj Organizo de la Esperanto-Movado. Verkis J. R. G. Isbrücker, 1932, 52 p. Konciza kaj simpla resumo de la historio kaj movado, precipe por kandidatoj pri la instruista kapableco de E.

Hitrow Panayot, kuracisto, nun en Sofia. Nask. en 1894. Multe vojaĝis tra la mondo. Vivis, studis kaj propagandis en Odessa, Tirnovo, Bucureŝti, Moskva, Berlin, Milano, Sofia. Verkis kaj eldonis diversajn traktajojn en naciaj lingvoj, E-lernolibrojn por rusoj, germanoj, kaj bulgaroj, Historieton de L. I. kaj aliajn. Eldonis ilustritan E revuon E-io, 1923—25. En 1925 fondis »Int. Unio E-ista« (v.)

Hodakowski Tadeo Kazimiro, polo, gimnazia instruisto. Nask. 26 jun. 1903 en Galicio. Estrarano de PIE kaj de PED. Lektoro de E en la Krakó-

wa Univ. kaj de radio-stacio en Krakow. Sekr. de LKK por la UK en Krakow 1931. Verkas ofte prop. artikolojn kaj red. P E-iston.

Hodler Hector, sviso, kunfondinto kaj dir. de UEA. Nask. 1 okt. 1887 en Genève, mortis 31 marĉo 1920 en Leysin. Lia patro estis la fama pentristo Ferdinand Hodler. Li lernis E-n en 1903 samtempe kun E. Priva¹, kiu estis lia lernejakamarado. Ili fondis E-klubon kaj jurna'el'on Juna E-isto. La lerneja benko estis la redakcio dum kvin jaroj, tie ili administris, skribis adresojn, korespondadis. Ili iom poste lernis Iúiom Neutral kaj BOLA², por konvinkiĝi, ĉu vere E estas la plej bona int. lingvo. — H. estis idealisto, sed kun granda praktika sento. Li pensadis senĉese, kiel li povus fari E-n praktike uzebla, per tio preparante int. tuthomaran popolon. Li opiniis, ke oni ne devas apartigi la mondlingvan movadon de la aliaj sociaj movadoj. Oni devas fari pere de int. organizo amasmovado E-n, malgraŭ, ke li bone sciis, ke E progresas jam per si mem, eĉ sen iuj specialaj organizaĵoj. Privat skribis pri li: »Al tio, kion iniciatis la genio de Z sur kampo lingva, li aldonis la necesan bazon sur la kampo socia.« — Eĉ ne fininte la gimnazion, li jam frue dediĉis sin tute al E. Li jam estis konata tiam pere de la Juna E-isto, artikoloj en Tra la Mondo kaj la traduko de la novelo de Bernardin de Saint Pierre Paŭlo kaj Virginio (1905). — En 1906, okaze de la dua UK lin interesis precipe la organizaĵ proponoj de Rouseau kaj Charles, pri la E-konsuloj, en kiuj li vidis realigebla sian planon, nome, organizi reciprokajn sinhelpojn inter bonvolaj homoj. Jen, la ĝermo de UEA kaj ĝiaj iniciatintoj. — En 1907 li transprenis la redaktadon de Esperanto de Paul Berthelot, kiu fondis kaj ĝis tiam redaktis ĝin. H. poste fariĝis ĝia posedanto. — 19-jara li estis, kiam la 12 febr. 1907 li publikigis sian unuan n-ron de 'E', kiu aperis tiam jam la trian jaron. H. volis redakti la gazeton al la tutmonda E-istaro, kaj vere, 'E' fariĝis la centra organo de la E-istoj. Li aperigis 'E'-n pli ol 13 jarojn regule (escepte 6 monatojn en 1914). Li verkis multajn

gravajn artikolojn, tradukis, sugestis traduki ĉefverkojn anstataŭ bagatelajoj. Li signis siajn artikolojn per: A. R. — La proponoj de Rousseau kaj Carles kunfandiĝis kun liaj planoj, ili estis pritraktataj en lia gazeto kaj trovis varman akcepton. Okaze de la UK 1907, ekzistis jam ĉ. 200 konsuloj. — UEA fondiĝis 28 apr. 1908. H. volis per ĝi »krei fortikan ligilon de solidareco inter diverslingvanoj.« Dum la milito H. kun la tiama sekretario de UEA Hans Jakob organizis la Dumilitan Helpservon de UEA, servo farinta eksterordinaran bruon — Al UEA H. postlasis gravan parton de sia havaĵo kun la celo certigi ĝian ekziston.

Estas karakterize por lia nobla animo kaj humaneco, ke en Genève li aliĝis al la loka bestprotektita societo, kaj diris, ke li ŝatus fari el UEA asocion, por protekti la homojn. — Je la fino de sia vivo, dum la milito, kiam li jam estis ofte malsana, li turnis sin ĉefe al sciencaj problemoj. En 1916 li skribis 387 paĝan franclingvan verkon pri la paca organizo de l'popoloj.

L. HALKA.

Hogg Elizabeth, angliano, instruistino. Nask. 29 jan. 1889 en Liverpool. Enkondukis E-n en lernejon, en kiu ŝi instruis. Rakonto pri tio Eksperimento de Eccles estas tradukita en multajn lingvojn. Verkis artikolojn pri instruo de E al infanoj. Ceestis la Int. Konferenco de E Instruistoj en Genève, 1921.

Hohlov Nikolao, ruso, supera ekonomiisto ĉe industria trusto. Nask. 1891 en Moskva. Edziĝinta. E-istiĝis en 1905. Kontribuis al La Ondo de E, Konkordo, LM, HDE, E kaj aliaj gazetoj lingvaj kaj kritikajn artikolojn, tradukis el angla, rusa kaj serba lingvoj. Liaj verkoj: La morto de delegito de UEA, originala komedieto, 1924; Krucumo, trad. de Drozdov, 1922; Orientaj Fabeloj, trad. de Doroŝević, 1928; La morto de Danton, trad. de Tolstoj, 1928; Historio de la Mondolingvo, trad. de Drezen. En 1928 aperis lia sola poemaro, La tajdo, kies moton: »De la musique, avant toute chose...« li kredeble elektis kun intenca ironio.

Ĝin kontraŭdiras jam la dua poemo, en kiu li sin komparas al Chanteclaire, kiu tro frue anoncas al dormantoj la venontan matenkrepuskon. Ĉu koka krio estas antaŭ ĉio muzika? Certe ĝia veka saluto havas valoron nur socialan. Ankaŭ en aliaj poemoj, Eŭropo, Moskvo kaj Mia patrujo, li esprimas socialajn sentojn. Tamen li ordinare verkas pli individuece, trovante sian inspiron en ĉia animstato kaj en simplaj travivaĵoj. Amo kaj sledveturo sub la steloj liveras inspiron por unu el la plej belaj poemoj en nia lingvo: Unua suno. Kombino de sentimento kaj realismo efikas virece en liaj ampoemoj: en pasia amanto li vidas la kaŝitan »odaliskon«, dum amanta virino estas mikso »el tigo kaj mimoz!«. Tamen ŝajnas nun, ke la sociala konscienco en H. venkis lian lirikiĝmon. Lia funde serioza menso sin turnis al pli urĝaj laboroj por la lingvaj instancoj de SEU kaj al tradukado de klasbatalaj poemoj.

W. B. JOHNSON.

Holanda E-isto estis la kunigo de Nederland-E kaj La Holanda Pioniro. Ĝi aperis en Amsterdam de jan.—dec. 1922 ĉiusemajne, 4 p. 23×16, entute 104 n-roj kun 426 p., de jan.—dec. 1924 ĉiu semajne, 4 p. 28×22 entute 52 n-roj kun 208 p.; de jan.—junio 1925 duosemajne 8 p. 28×22 entute 10 n-roj kun 96 p.; de jan. 1926—dec. 1931 (lasta n-ro) duosemajne 8—20 p. 23×15 entute 150 n-roj kun 2128 p. Red. A. Klock. Enhavis propagandon, kronikon, instruleterojn, post jan. 1924 ankaŭ literaturon.

P. TARNOW.

Holando, v. Nederlando.

Holmes (hoŭms) John Thomas (ps. J. T. H.), anglo, lankomeristo. Nask. 9 dec. 1868 en Morton. Multjare sekr. kaj prez. grupa kaj federacia; vicprez. de BEA, ano de LKK por la Oxforda UK. Unua aŭlandano parolinta E-e per radio en Germanujo. Faris centojn da prop. prelegoj kaj gvidis multajn kursojn.

Homar Franjo, kroato, mortigis sin juna en 1933. Impulsema prop-isto, komitatano de JEL, red. de La Suda Stelo. Trad. de kroataj poemoj.

Homaranismo. Idearo de Z, por kiu li pledis en aparta »Deklaracio« kaj en aliaj skribaĵoj. Laŭ la Plena Vortaro »Doktrino postulanta, ke ĉiu rigardu kaj amu ĉiulandajn homojn kiel siajn fratojn.« La plej karakterizaj kaj gravaj estas la du unuaj punktoj de la »Deklaracio«: »Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion; la dividitecon de la homaro en diversajn reciproke malamikajn gentojn kaj gentreigiajn komunumojn mi rigardas kiel unu el la plej grandaj malfeliĉoj, kiu pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo. — Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj. Ĉiun ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, alia lingvo aŭ alia socia klaso ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.« Dietterle en la O. V., p: 312—343 publikis la tutan materialon kaj aldonis pri Z i. a.: »La tre ideala homaranisma ideo okupis lin dum lia tuta vivo, kaj — kiel ŝajnas al mi — por li estis ankoraŭ pli grava, ol la tuta ideo de int. lingvo, kiu evidente servis al li nur kiel vojo al la ideala celo, kiun li esprimis per la preskaŭ sinonimaj vortoj »hilelismo« kaj »homaranismo«. Pro diversaj kaŭzoj li komence timis, publikigi siajn ideojn sub sia nomo: 1. pro la politika situacio en la tiama Rusujo, 2. pro tio, ke li antaŭvidis atakojn kaj kritikojn eĉ de la plej fidelaj adeptoj de lia lingva ideo, 3. ĉar li ne volis, ke oni intermiksi la du por li samcelajn, sed principe diversajn ideojn.« Z ne sukcesis fondi movadon por H., ja tion malhelpis ankaŭ la militeksplodo, sed troviĝis multaj, precipe inter la pacifistoj, kiuj simpatiis kun tiu idearo. Laŭ marksisma vidpunkto la H. »kapablus nur fuŝi realan komprenon de la ekzistantaj soci-fortoj.« (Drezen, Z, p: 13.)

Ho, mia kor'. Poemeto de Z, verkita nelonge antaŭ eliro de la Unua Libro 1887. »En tiaj tagoj Z verkis versajon tre mallongan. Ĝi sonas iom kiel spirado malfacila de homo suprenkurinta kvin etaĝojn de ŝtuparo kaj staranta antaŭ pordo halte.« (Privat, Vivo de Z, p: 35.)

Homoj sur la Tero. Romano, originale de Engholm, eld. 1932, 202 p. »Interesa rakonto, flua komprenebla stilo, agrablaj naturskizetoj inter la faktoj sinsekvaj, portretoj tre sukcesaj, se oni atentas, ke la personoj estas preskaŭ senkarakteraj, lertaj novaj esprimoj kaj komparoj.« (G. S., 'E', 1933, p: 60.)

Homulle Rudolphus Henricus, nederlandano, direktoro de sten. instituto. Nask. 20 jun. 1887 en Amsterdam. Kreinto de la unueca nederlanda sten. Iniciatis la unuan grupon en A. en 1905 kaj katolikan grupon en 1910. Trad. broŝuron de Cart Unu horo de E.

Honduraso, Centra Ameriko. Unua E-isto kaj UEA-del. estis H. Dike, veninta en 1926 el New-York kaj loĝinta iun tempon en San Pedro-Sula. En 1931 alvenis la landon Mauricio Jagoda, juna sed malnova E-isto, kiu publikigis artikolojn, gvidis la unuan E kurson en Progreso. Pro la revolucio de generalo Ferrera ĉio estis detruita kaj kelkaj kursanoj mortis en la fratbatalo. En 1932 Jagoda lokŝanĝis al Tela kaj varbis por E la nunan UEA-del.. David Medina Bangs, kiu nun gvidas tie kurson. En Olanchito Jagoda varbis por E la kuraciston d-ron Pompilio Romero, nuna UEA-del., kiu faris diversajn tradukojn el E al hispanaj kaj dank' al li fariĝis E-isto la verkistino kaj edukistino f-ino Visitacion Padilla, la unua UEA-del. en la ĉefurbo Tegucigalpa. M. JAGODA.

Hookham (hukm) John Edward, anglo, urbolicisto. Nask. 15 aŭg. 1880 en London. E-istiĝis 1911. De 1922 vicsekr. de IKUE. De 1926 sekr. de Angla Ligo de Katolikaj E-istoj.

Hori Mamiĉi, (ps. Vervojo), japano, publika prokuroro de distrikta juĝejo de Tokvo. Nask. 25 jul. 1900, en Nara-si. E-istiĝis dum vojaĝo en Siberio, 1918. Vicprez. de 20-a J Kongreso. Sekr. de sep JE kongresoj.

Horizontoj. Poemoj de Barbarus, el la estona trad. Hilda Dresden, 1931, 78 p. »Poeto de fanfaroj, arda maltrankvilo, grandurba, ŝajna, sistema anarkio, zigzagoj kaj geometrio, harmonio kaj revolucio. La formpreteco de H. D. preskaŭ ĉiam tri-

umfas pri la malfacilaĵoj.» (Szilágyi, L. M., 1932, p: 19.)

Horn Isabelle M., usonano, aŭtoro kaj ĵurnalisto. Nask. en Washington, E-isto de 1910. Helpa sekr. de EANA 1910—16. Sub-redaktoro de Amerika E-isto, 1913—16. Ano de Administra Komitato de EANA.

Horneck (hornek) Rudolf, aŭstro-germano, dir. kaj posedanto de komerca lernejo (en Graz), kie ankaŭ E estas instruata. Multe varbas por E kaj gvidas kursojn.

Horner Rodolphe, sviso, int. sekr. de YMCA (Kristana Unuiĝo de Junaj Viroj). Mortis 62 jara en 1927 en Zürich. Disponante fundajn lingvajn konojn, li faris grandajn vojaĝojn kaj laboris en Usono, Portugalujo, Hispanujo por YMCA. Pioniro de E en Portugalujo. Estis prez. de la EG en Genève. Estis oficiala delegito de la Ruĝa Kruco ĉe postmilitaj UK-j.

Hoschek (hoŝek) Rudolf, aŭstro-germano, revizoro librotenada en Wien. Nask. 10 majo 1881 en W. E-isto de 1911. En 1915 venis en militkaptitecon en Berezovka (Rusl.). Tie li pliperfektigis en E, konatigis kun J. Baghy, kun kiu li estis kune ĝis 1918. En 1918—19 en Berezovka estis semajna E-Rondo. Reveninte hejmen en 1920 li laboris plu por E, ĉefe en la komerca kampo.

Houbart (ubar) Emile, franco, publicisto. Nask. 19 apr. 1874 en Septeuil (apud Paris). Eldonis en 1909 la gazeton *E-Nouvelles*, kiu farigis, unu jaron poste, *La Movaĉo*, monata ilustrita, la grava franca propaganda revuo. Li redaktis kaj publikigis ĝin de 1910 ĝis 1914 kaj de 1923 ĝis 1933. Li faris multajn intervjuojn pri E kun eminentaj personoj, multnombrajn prop. artikolojn, ktp.

Höveler Herbert F. (plumomo: E. Ĉefeĉ, laŭ la angla prononco de la literoj H. F. H.), germano, industria ĥemiisto, metalurgo. Nask. 1859 en Germanujo, mortis 1 sept. 1918. E-istiĝis en 1904. Elpensis la propagandajn »ŝlosilojn«. La unua (en angla lingvo) aperis en 1905, verkita kunlabore kun Millidge. Jam en 1912 ili aperis en 18 lingvoj; ankaŭ divers-

lingvaj »Tutoj« (ŝlosilo en pli granda formo): preskaŭ ĉio je propra respondeco. Fondis je propra financa respondeco Int. Propagandejon E-istan por daŭrigi tiun laboron. Iniciatis la sistemon de transpagiloj por int. monpagoj kaj la Ĉekbankon E-istan. Fondis grupojn en London, Funchal, Sicilio, Italujo, Palestino. Malavare subtenis la movadon tutmonde. LK de 1908, Akademiano de 1912. Vicprez. de BEA. Verkoj: Kio povas okazi, se oni donacas surprize; Tutmonda Anekdotaro, La Elparolado de E, k. a.

Hovorka Nikolao, (antaŭmilita barono de Zderas), aŭstrian, verkisto, ĉefredaktoro de la germanlingva periodaĵo, »Berichte« (Wien). Nask. 6 dec. 1901 en Tesliĉ, Bosnio. En sia revuo li donis konstantan rubrikon al E. Prez. de la ES-j: UEU en Wien, EOO de urbo W. Kunfondinto kaj sekr. de la Laborkomitato de la Wien-aj ES-j. Kunorganizanto de sukcesplenaj Cseh-metodaj kursoj en W. dum printempo 1932. Nun sekr. de AEA. Subtilvoĉa poeto, al kiu la poemo estas festotaga plezuro. Malgraŭ tio, ke H. ne verkis ankoraŭ multe da poemoj, lia animklavaro eksonigas diversajn melodiojn, kelkfoje kun forta kolektiva sento, kies karakteriza ekzemplo estas la poemo *Gefratoj kun igula manojn.* (LM. 1932, p: 150.) F. SZILÁGYI.

Howard (haŭard) Sir Ebenezer, anglo. Mortis 77-jara 1 majo 1928 en Welwyn Garden City. Pioniro de la ĝardenurba movado. E-istiĝis antaŭ 1907.

Hromada Rudolf, ĉeĥo, bankoficisto. Nask. 13 jun. 1890. Depost fondo de CAE (1920) ĝia ĝen. sekr. Red. kaj eld. de *La Progreso* de 1923. Kunfondinto kaj kunred. de *Ĉeĥoslovaka Gazeto*, 1921—23. Gvidanta persono en la ĉ. E-movado. Estis ano de ICK depost ĝia fondo ĝis 1930, poste konsilanto. Estis komitatano de UEA. Kunverkinto de *Vortaro E-Ĉ.*, 1926, II. eld. 1932.

Hsu W. K., ĉino. Studis en Francujo, 1904. Revenis en Canton, 1908, kie li propagandas E-n, 1909. Mal-

fermis kursojn en la normalaj lernejoj de Nan-Wu, Kaiming kaj Kao-chung, 1909—10. Granda sukceso en la Popola Kolegio, 1912. Fondis E Asocion kun Sifo. Unua pioniro de E en Suda Ĉinujo. Liaj E lernantoj: Sifo, Sinpak, Kenn. Artikoloj en *La Voĉo de la Popolo*. Revenas al la movado en 1926. Kunlaboras kun Wu Takwong, Sinpak kaj Kenn. Prof. de E en Cantona E Instituto.

Hübner Louis, germano, d-ro fil., gimn. prof. Nask. 7 jun. 1850 en Tiefensee. Verkis matematikajn librojn kaj disertaciojn. Titblinda de 1905. Li lernis E-n en 1908. Fondis la E grupon en Schweidnitz, 1909. Artikoloj, paroladoj.

Hubricht (hubrijt) Kurt, germano, Nask. 18 febr. 1890 en Leipzig. E-isto de 1914. Kiel fervora aganto en la liberpensulaj organizaĵoj, ankaŭ sur E-a kampo laboris multe por siaj ideoj: fondo de Int. Ligo de Liberpensuloj (ne plu ekzistas), poste agado en la Liberpensula Sekcio de SAT, ampleksa laboro por E en liberpensulaj rondoj (artikoloj, kursoj, ekzpozicioj), en 1924—26 eldono de la gazeto *Liberpensulo*. Nuntempe finlaboras la verkon *Libro-Leksikono de la E-lingva literaturo*, kun enhavresumo kaj aliaj informoj.

Huet (üe) Horace, franco, Nask. en 1860, mortis 28 febr. 1911 en Nice. E-isto de 1902; Fondis kaj prez. la grupon de Nice, poste vicprez. la grupon de Parizo. Redakcia sekr. de la *Revo*. Mirinda lingvisto, studema kaj analizema spirito, kun vasta kaj firma klereco. Li komparis la jam aperintajn vortarojn, profunde pristudis la Z-ajn verkojn, preparis en 1907 liston da 2200 novaj radikoj (presitan en 1911) kaj amasigis slipojn de multvaloraj notoj por granda vortaro. Li prezentis tiun laboron al la LK (1908), sed lia laboro ne estis publikigita. Li sentis progresantan senfortiĝon, kaj, laŭ lia peto, Bourlet proponis al Grosjean-Maupin, ke li prenu sur sin la taskon daŭrigi la laboron kaj fari kompletan vortaron. Tradukis unuaktan komedion *La Fluido de John*, multfoje luditan. — LK, 1905.

Hugai Ferenc, hungaro, prof. de lingvoj. Nask. 2 okt. 1884 en Vámosgyörk. Prop. paroladoj, artikoloj, instruado de E. Arangis la H-E Kongreson en Gyöngyös, 1926.

Humez (üme) Alberic, franco, entreprenisto en Douai. De 1908 seninterrompe UEA-del.

Humoro estas en E samsignifa kiel itale *umore*, france *humour*, angle *humour*. En vasta senco ĝi signifas ĉian, ĉu gajan ĉu malgajan spiritan staton, strikte humoro estas mallongigo de *bonhumoro*, kiel peza estas mallongigo de *multepeza*.

En tiu malvasta senco ĝi estas tre disvastigita en E-ujo: la ĉefa fonto de E-a humoro estas la idealisma fervoro de la anoj de E. Precipe la UK-j donas al ili okazon ĝoji kaj gaji. Ju pli multaj estas la eksteraj malfacilaĵoj barantaj de la »pacaj batalantoj« la vojon al sukceso, des pli senĝena kaj laŭta fariĝas la humoro de la anoj de lingvo int., kiam ili trovas sin inter si. La seriozaj E-istoj ĝuas la feston de la E-ista popolo pribabilante la kongresajn okazintaĵojn kaj poste raportas al la hejmrastintaj samlandanoj kun la sama kongresa humoro la kongresajn impresojn. La junularo ĉerpas la kongresan bonhumoron el sia propra kuneŝto, humorante precipe pri la »eminentuloj«.

Kiel modelo de »kongreshumoro« povas servi la raporto de Ned Karyn pri la Berna UK en 1913 en L. I. n-roj VIII—IX. Kun neevitebla efiko li igis nin ridi priskribante en formo de Leteroj al sia nevino la Naŭan Kongreson. Laŭ tiu modelo ankaŭ aliaj kongresoj donas konstantan temon al humoraj raportoj, kaj oni povas kun certeco aserti, ke la regula E-ista kongresraportisto estas regula humoristo.

Aliaj fonton de humoro formis en 1908—14 la bataloj kontraŭ Ido kaj aliaj konkurantoj de E. La penadoj de René de Saussure kunigi E-n kun Ido en lia Antido estis akceptataj de la E-istaro kun neŝancelebla humoro. Modelajn felietonetojn donis pri tio Era en la L. I.

En Juna E-isto per bonaj originalaj aŭ laŭmemoraj humorrakon-

tetoj riĉigis la E-an literaturon ĝia ĉefred. **Paŭlo Lengyel**, aŭtoro de *Libro de Humorajoj*.

En Paris verkas nuntempe majstro de E humora poezio **Raymond Schwartz**, aŭtoro de *Verdkata Testamento*, kolekto de versformaj satiraĵoj, miksitaj ofte kun bonaj vortludoj. La afero de E konkure kun la eterna afero de A mo formas plejan temon de liaj rikanajoj. En 1933 Schwartz ekredaktis humorgazeton *„La Pirato“*, kiu »kaperas« ĉiumonate.

Antaŭ la milito aperadis *La Spritulo*, multe malpli originala, ĉar simple kopianta el naciaj gazetoj pli-malpli taŭgajn spritaĵojn. La Pirato estas tute alia, ĝia red. disponas specialan talenton.

La humoro trablovis post la milito eĉ la E didaktikon. Pastro Ĉe ekuzis tiun potencon korvarbilon kiel Instrumenton de instruado al la amasoj. Aperis eĉ *Gaja Lernolibro* de **Walter**, kiu, cetere, meritas citon pro la bonaj amuzaj ilustraĵoj.

En E aperis kelkaj anekdotaroj, plej ofte tradukoj el nacilingvaj libroj kaj gazetoj. Ilia destino estas ne tiom amuzi, kiom instrui E-n al progresemuloj.

Ni ne citas aparte la tradukverkojn kun humora enhavo, ekz. la komediojn de **Molière** kaj **Shakespeare**, la novelojn de **Dickens** aŭ la lirikaĵojn de **Heine**, kiuj aperis en E. Verkistoj kun humoraj tendencoj en multaj siaj verkoj estas: **J. Merchant**, **J. Baghy**, **J. Kenngott**, **I. Lejzerowicz**, **R. Schwartz**, **Dreves Uitterdijk**, **F. Szilágyi** kaj kelkaj aliaj. (v. Vortludoj, karikaturo.)

L. DREHER.

Hungara Antologio. Redaktis kaj grandegan parton de la poemoj tradukis **Kalocsay**, kunlaboris **Baghy**, **Bodó**, **Halka**, **Szilágyi**, **Totsch** e. Poemoj kaj noveloj de 50 hungaraj verkistoj. 1933. 473 p. kaj 24 klišopaĝoj kun la portretoj de 47 verkistoj. Simila verko eĉ en grandaj naciaj lingvoj ne ekzistas pri la hungara literaturo. »La redaktantoj celis »konigi nungarajn literaturajn trezorojn kaj samtempe doni kiel eble plej valoran kontribuon al la E-a literaturo«. Ĉiu justa juĝanto verdiktos ho-

nore realigita tiun duoblan taskon, kaj deziros sukceson al tiu nesuperbla libro al la AELA-entrepreno.« (G. S. 'E', 1933. p: 167.)

Hungara E-isto. Pro malkonsentoj kun la eld. de *La Verda Standardo*, **A. Marich**, HES estis devigata krei propran informilon. Ĝi tion faris unue per *Sciiganto*, kiu komencis aperi en majo 1908 kaj ĉesis per la 3-a n-ro jan. 1909. Ĝin anstataŭis en marto 1909 HE, IV+8—12 p. 24×16—17. En 1911 HES akordigis kun LVST kaj akiris ĝin por la societo, do HE malaperis. Red. **Miletz**, poste **d-ro Schatz**. En julio 1918 HE reaparis en Szeged 8—36 p. 23×16 kaj restis tie ĝis okt. 1923. Red. **Turzó**. De jan. 1924 HE transloĝis al Budapeŝt kaj ĉesis tie en febr. 1926, 4—10 p. 24×16. Red. **d-ro Takács**. Entute aperis de julio 1918 83 n-roj kun 700 p.

P. TARNOW.

Hungara E-Muzeo provizore en **Nagyvaros**, fondita en 1932. La bazo estas kolektaĵo de la gvidanto, **d-ro Jozefo Takács**: 230 libroj, 70 gazetoj, ĉ. 1000 gazeteltranĉaĵoj, 40 murafiŝoj, 500 flugfolioj, 250 leteroj, poŝtkartoj, 20 vizitkartoj, 60 fotografajoj, plena kolekto de **H** glumarkoj. Celo: kolekto de ĉio pri la mondlingva movado en H-ujo.

Hungara Heroldo. Gazeto movada, aperanta en Budapeŝt, fondita jan. 1928 de **L. Kökény**, kiu red. kaj eld. ĝin ĝis dec. 1930. La programo de H. H. en tiu unua periodo estis: 1. Disvastigo de E. 2. Kunlaboro de la E-Societoj. 3. Servo por la paco kaj progreso. 4. La eksterlanda konatigo de la hungara kulturo. 5. Akcelo de la hungara fremdultrafiko kaj de la Budapeŝta Int. Foiro. 1928—30 aperis 28 kajoroj kun 360 paĝoj. De 1931 H. H. aperas nur kvaronjare, ĝin eld. HES. Red. de 1931 ĝis okt. 1932 **J. Mihalik**, de tiam **d-ro J. Takács**. Formato 15×23 cm.

Hungarujo. Malgranda nacio, kun lingvo neapartenanta al la hindoeŭropa lingvofamilio, popolo vivanta en la multlingva Mez-Eŭropo: jen bona tereno por lingvo int., tamen E atingis la landon nur en 1897.

La unua E-isto estis **d-ro Gábor Bálint**, univ. prof. en Kolozsvár, (nun

Cluj en Rumanujo) varbita por E verŝajne per la propaganda laboro de L. de Beaufront. En 1897 Bálint eldonis litografite la regulojn de E kaj gvidis kurson por univ. studentoj. Partoprenis ĝin ankaŭ juna ĵurnalisto Ábel Barabás, kiu verkis kaj en 1898 eldonis la unuan E-lernolibron en H lingvo. La instiganto kaj verkinto de la antaŭparolo estis mem Bálint, kiu sprite kaj energie rifuzis la atakojn kaj mokojn, dirante i. a., ke manion havas tiu, kiu ne kredas la progreson de la homaro kaj kiu preferas la disigon de la homaro per finaj muroj.

Sekvis multaj artikoloj atakaj en la gazetaro, nur malmultaj defendaj, kaj mem la gramatikon aĉetis nur kelkaj, inter ili Pál Lengyel, posedanto de malgranda presejo en Szekszárd. Li farigis tiet fervora E-isto, ke en 1900 li transprenis la eldonadon kaj presadon de la gazeto »Lingvo Internacia«, eĉ en 1904 elmigris al Paris, por kunfondi kaj direkti la »Preso E-ista Societo«-n.

Intertempe dum 1901 en Budapeŝt ekfunkciis la unua E-grupo, kun gvidanto József Miletz; tie eklaboris ankaŭ Ágost Marich. La kunveno okazis en trinkejo (Kecskenéti Borház, Dob-strato 100), pri kiuj Géza Nyulászky skribis en »H-landa informilo« (1912) jene: »Malhela petrol-lampo pendis suben de la plafono kaj per flama lumo videbligis la riĉan meblaron, kiu konsistis el nerabotita tablo, kovrita per tukoj, jam du semajnojn ne purigita, apud la muroj benkoj, sur kiuj sidis la unuaj »hirundoj« de E. Fervora junulo, J. Süßmuth instruis la lingvon, sed la animo de la tuta societo estis J. Miletz. La 10 krejceraj kotizajoj de ĉ. 20 membroj kaj la »grandaj« donacoj ebligis al ni aĉeti malgrandan tabulon, kretan kaj spongon.« En 1903 jam aperis la dua gramatiko, verkita de Lengyel, Schwörer kaj Miletz kaj en la sama jaro fondiĝis la Unuiĝo de la H-aj E-istoj; prez. Miletz. La Unuiĝo en 1904 eldonis litografitan gazeton: »Esperanto«, de la dua n-ro sub la titolo »Hungara Esperanto«; red. Miletz.

En 1905 Marich fondis la H E-istan Societon kaj en majo 1905 aperis la unua presita prop. gazeto per subteno

de Lud. Makay en Budapeŝt sub titolo »Esperanto«, kiu post du jaroj ŝanĝis la titolon je *La Verda Standardo* (LVSt). En tiu tempo funkciis grupoj aŭ rondoj en Versec (kie prof. Tholt laboris tre ageme), Szeged, Debrecen kaj Kolozsvár. Vizitoj de kelkaj eksterlandanoj, kiel tiu de Fructier en 190?, prof. Öffret el Lyon en 1903, G. Kolowrat el Ruslando en 1904 estis bonefikaj. La propagando estis fekunda ĉefe ĉe la stenografoj, Lajos Jakab kaj Zoltán Baranyai en 1907 sukcesis voĉdonigi la sten. societon en Szeged. (v. Stenografio). La propagando havis sukceson ankaŭ okaze de la Int. Kuracista Kongreso en 1909. (d-roj Róbert Schatz, Leo Loránd kaj József Kovács).

En tiu tempo jam laboras tute grand-skale Marich, kiu ĝis la mondmilito restis la plej agema H E-isto. Li laboris tre multe, vojaĝis tra la tuta lando, faris prop. paroladojn, kolektis monon, aranĝis kursojn, eldonis kaj redaktis la gazeton LVSt, kiu estis bonega en kelkaj rilatoj. LVSt en okt. 1908 jam anoncis, ke ĝi havas 1400 abonantojn, de majo 1905 ĝis majo 1910 la enspezoj de la gazeto, kiu estis ne nur gazeto, sed ankaŭ prop. servo kaj libera organizaĵo, estis 20.544 kronoj. »La sumon — tiel skribis Marich — ni kunskrapis per niaj dek ungoj.« Laŭ lia artikolo en »Közbiztonság« (1908) E havis tiam 13.5 milionojn (!) da adeptoj. En la marta n-ro de LVSt li komunikis novan statistikon, laŭ kiu en 1887 estis 100 kaj en 1910 8,550.000 E-istoj. En la jan. n-ro li skribis: se ĉiu el la abonantoj akiros po unu 1—3 novajn abonantojn, en junio LVSt jam povas aperi kiel taggazeto. En la sama jaro li komunikis, ke lasttempe li instruis E-n en 16 diversaj lernejoj.

La vigla kaj ampleksa agado de Marich donis fortan puŝon al la movado, kvankam kelkaj strangaj flankoj de tiu ĉi agado kaŭzis ankaŭ malbonŝancajn konsekvencojn. Jam en 1909 granda parto de la HES-anoj estis malkontenta pri la agado de Marich kaj pro tio ili elektis novan prezidanton: ĉef-apelacian juĝiston Dezső Szentmáry. Marich kaj liaj amikoj ekŝiĝis, restis nur 98 anoj, sed jam en 1910 la laboro de la societo plivigliĝis kaj la membr-

aro duobliĝis. Tiam jam aperis la HE-isto, posteulo de la litografita »La Sciiganto«, red. de János Medgyesi, poste de Schatz.

24 majo 1911 la du disigitaj societoj kunfandiĝis sub nomo de H-landa E-Societo kaj prez. fariĝis tutlande konata politikisto, gvidanto de sociaj reformmovadoj, d-ro Sándor Giesswein, kiu restis prez., de ĉiuj estimata, ĝis sia morto en 1923. Jam 23 majo 1911 Giesswein pledis en la parlamento por la instruado de E kaj li ricevis komision reprezenti la ministron de la edukado dum la UK en Kraków kaj poste en Antwerpen. Okazis tiutempe vizitadoj de kelkaj konataj eksterlandaj E-istoj. Parrish en nov. 1911, Ciklari kaj Privat komence de 1912 restadis en Hungarujo. La eldono de Lud. Kóka i komencis eldoni E-librojn, eĉ aranĝis literaturan konkurson en 1912, la konkurson gajnis Jenő Forster per Mikszáth-tradukoj.

La movado estis jam tiel fortiĝinta, ke 21—23 aŭg. 1912 oni povis aranĝi en la ĉefurbo la unuan H E-kongreson, kiun ĉeestis ankaŭ multaj alilandanoj, venintaj de la UK en Kraków. La kongreso bone sukcesis, oni prezentis en la Urania-teatro la komedion triaktan »Tri Gardistoj« de Herczeg en la traduko kaj ĉefrolo de Olga Liebner. Samokaze estis en Budapeŝt ankaŭ la Tria Katolika E-Kongreso. La dua landa kongreso okazis en 1913 en Arad, la tria en 1914 en Szeged, kie kaŭzis akran debaton la problemo, ĉu la sekva kongreso okazu en Pozsony (Bratislava) kune kun la aŭstria kongreso; fine la plimulto (52:16) aprobis la komunan aranĝon. (Sed ĝi ne okazis pro la milito.)

E-istoj sukcese propagandis ankaŭ ĉe int. kongresoj de feministoj, stenografiistoj kaj libroeldonistoj, okazintaj ĉiuj tri en 1913. En kongreso de komerca instruado estis E-ekspozicio aranĝita de P. Balkányi, kiu tiam funkciis unue, kiel memstara propagandisto. Majoro Mavro Špicer aranĝis publikan ludon de la »Espero« per milit-orkestro en kafejĝardeno. E atingis ankorau aliajn sukcesojn. »H E-isto« en 1909 ricevis ŝtatan subvenciojn por presigo de kajero pri H banlokoj (1500

ekz.), en 1910 komenciĝis la prop. laboro ĉe la Printempa Foiro, estis ebleco gvidi kelkajn kursojn en lernejoj, eĉ en la universitato de Budapeŝt, mem la rektoro en 1912 teol. prof. d-ro János Kiss, estis E-isto.

La vasta laborado alportis siajn fruktojn ankaŭ en la provinco. Eble la plej vigla movado estis en Pozsony, kie 2 jun. 1912 okazis standardo-festo, partoprenita ankaŭ de E-istoj el Wien.

Fondiĝis ankaŭ nova, grava societo: la H-ia E-ista Societo Laborista (HESL). La fondiĝkunvenon partoprenis 30 personoj, prez. fariĝis Izsó Polgár, la ĉefa iniciatoro kaj en la fondo havis gravan rolon ankorau József Nagy, Pál Balkányi, Mihály Zsámboky ktp. HESL eklaboris vigle, ne timante pro la malhelpoj, el kiuj unu tiutempe kaŭzis publikan pritraktadon. En Székesfehérvár la polico malpermesis la prop. kunvenon, kun la motivo, ke E estas kvazaŭ ŝtelista lingvo (»slango«). Kiam kelkaj gazetoj atakis la policedron, lia nova motivo estis »Estas nepermesate, ke laboristoj lernu lingvon, kiun ne komprenus la laboronantoj«. Giesswein 5 nov. 1913 faris interpelacion en la parlamento kun sufiĉa sukceso. HESL eklaboris ankaŭ province, en Kassa (Košice) Julio Baghy havis sian unuan kurson en la HESL-grupo.

Meze de 1914 la movado montris konstantan progreson, sed la militeksplozido igis duonsvena la tutan movadon. Ĝi mutigis la plej entuziasmajn E-istojn per la cenzuro, malhelpis jam de la militkomenco la E-lingvan korespondadon kun la eksterlando, distranĉis la int. rilatojn. (»H. E-isto 1918 okt. kaj 1919 apr.) LVSt aperis ankorau kaj ĝi petis foje »la militistajn s-anojn, ke ili en la milito ĉiam portu la E-an stelon«, sed ankaŭ ĝi ĉesis en okt. 1915.

Nur en 1917 montriĝis kelkaj signoj de la reviviĝo. En 1918 en la militekspozicio sur la Margaretinsulo estis ŝranko (aranĝita de Balkányi) — apud grenado de 42 cm-a kanono! — kiu montris interesajn dokumentojn pri la milita rolo de E. Samloke okazis vesperkunveno por honori la malnovajn pionirojn, d-rojn Loránd kaj Schatz,

kiuj revenis el la militkaptiteco. László Izsó komencis presigi abunde flugfoliojn pri E. Komenciĝis regulaj grupkunvenoj, precipe laboris Geiger, Elek Tolnai, Balkányi kaj Béla Rácz. En jul. aperis la H E-isto, red. kaj eld. Péter Turzó en Szeged, kaj tiu ĉi ligilo donis freŝan forton al la movado. Ankaŭ la Orienta Foiro denove donis lokon por E-ekspozicio. Okazis komuna ekspozicio de filatelio kaj E.

Tuj post la militfino eklaboris sub aŝferigado de d-ro Béla Rácz la Komitato por Disvastigo de LI, kies ĉefa viviganto estis Balkányi, inter la membroj famaj protektantoj: F. Karinthy, prof. J. Balassa, prof. Zs. Simonyi k. a. Propagando vigla, kursoj multloke. Refortiĝo ankaŭ en la provinco. 9 marto 1919 okazis E-tago en Budapeŝt.

Pri la tempo de la sovetareĝimo (21 marto — 1 aŭg. 1919) ni legas en »H E-isto« (1919, n-ro 5.), ke la publikinstruada popolkomisarejo eldonis unufoje 25.000, dufoje 5.000 flugfoliojn kaj 5.000 prop. glumarkojn pri E, permesis la instruadon en la ĉefkaj mezlernejoj, kreis apartan E-Oficejon ĉe la poŝto, oni instruis E-n en 12 lernejoj kaj oficiale ĉe kelkaj institucioj, HESL eldonis kajeron en multmil ekzempleroj pri la komunistaj celadoj, ricevis belan klubojn, ktp. Sed E estis uzata ankaŭ de la kontraŭrevolucia registaro en Szeged, kie tri E-istoj estis envokataj en la ministerion por propagandaj aferoj.

La politiko, ĉefe la dispecigo de Hungarlando per la kontrakto en Trianonon, influis la E-movadon ankaŭ en la postaj jaroj. La naciismo plifortiĝis kaj kelkaj gravaj institucioj, kiel la Universitato en Budapeŝt, Scienca Akademio aperigis siajn broŝurojn kontraŭ la trianona kontrakto ankaŭ en E. Tiaspecan broŝuron eldonis jam ankaŭ la bolŝevika registaro, tiun celon havis la 5 n-roj de la »H Revuo«, sed la plej ampleksan laboron plenumis de 1928 la H Nacia Asocio, kiu aranĝis eksterlandajn vojaĝojn de d-ro Gyula Lukács kaj István Puskás, sendis flugfoliojn al miloj da adresoj de E-istoj ktp.

La reorganizo de la societoj post la militaj kaj revoluciaj tempoj okazis kontentige. La budapeŝta grupo de HES akiris por jaroj konstantan kunvenejon en la Socia Muzeo, kie oni aranĝis regule kursojn, kunvenojn, literaturajn vesperojn. En jan. 1921 Julio Baghy revenis el la siberia militkaptiteco kaj gvidis kurson en HES (poste multajn aliajn), kies partoprenintoj fondis la grupon ERA. Ĝiaj 18-25 membroj laboris tre aktive dum kelkaj jaroj (1921—24), gvidis kursojn, aranĝis la gazetservon, E-festenojn. La redakta komitato de Literatura Mondo varbiĝis plejparte el tiu ĉi grupo: J. Baghy, Balkányi, Béla Bayer (la lasta verkis gramatikon por la revuo »Tolnai Világiapja«). En 1921 post la UK en Praha okazis bone vizitata postkongreso en Budapeŝt, per la persista laborado de ERA, kun multaj aranĝaĵoj.

En 1922 oni jam aranĝis la IV-an landan kongreson en Miskolc, kie ĉeestis 214 E-istoj el 19 lokoj. Tiuokaze oni fondis la H E-Instituton, kiu funkciis dum kelkaj jaroj, sub la gvidado de polickapitano d-ro Vince Tóth kaj ĝia ĉefa merito estis, ke ĝi eldonis unu el la ĉefverkoj de la H literaturo, »La Tragedio de l' Homo«, de Madách, en la majstra traduko de Kalocsay. Kaj de tiu ĉi tempo la literaturo havis gravan rolon en la H movado, almenaŭ pro la fakto, ke Baghy kaj Kalocsay, du eminentaj verkistoj de E, estas hungaroj, kaj mem Literatura Mondo aperis de okt. 1922 en Budapeŝt, (unua eldonanto de LM estis d-ro Tivadar Schwartz). En 1923 la V-a H kongreso okazis en Pécs, kiu partoprenis 190 anoj (el Pécs 90, el Budapeŝt 30, el Miskolc 14, el Kaposvár 7, el Szeged 5, el Szombathely 4 E-istoj ktp.). Ankaŭ la sekvaj kongresoj — la VI-a en Szombathely 1924, la VII-a en Budapeŝt 1925, (tiun la nova budapeŝta radio ebligis tuthoran koncerton de LM) la VIII-a en Gyöngyös 1926 — faris pli-malpli da propagando. En 1924 post la UK en Wien la budapeŝtaj E-istoj denove aranĝis postkongreson, kiu revokis multajn izolajn E-istojn, kiujn ne interesas la prop. aŭ organizaj laboroj.

La terenoj de la laborista so-

cieto estis ĉefe la sindikatoj, la organizaĵoj de la socialdemokrata partio. Ĝis 1921 HESL fondis 6, ĝis 1929 30 grupojn, el kiuj tiam funkciis 22 grupoj. HESL superis en kelkaj rilatoj la neŭtralan socion: la instruado, la supera kurso (gvidita dum jaroj de Baghy), la biblioteka afero, la propagando estis prizorgataj pli sisteme, la societo havis eĉ kantistaron de 1922 ĝis 1927, sub profesia gvidado, eble la unuan E-kantistaron tiom ampleksan en la mondo. La ĉefan organizon kaj administran laboron de HESL plenumis de 1924—1930 kiel oficisto Vilmos Bleier.

Jen kelkaj ciferoj pri la evoluo de la du societoj. HES havis en 1909 100, en 1910 200, en 1912 241, en 1913 128, en 1914 113, en 1921 98, en 1922 329 anojn (9 grupoj), en 1923 435, en 1924 537, en 1925 524, en 1928 105, en 1929 116, en 1930 132, en 1931 123, en 1932 214 anojn. HESL havis en 1922 1000 anojn, en 12 grupoj, en 1923 510 anojn, en 1924 836 anojn, el kiuj 702 estis aktivaj, 134 subtenantaj, en 1925 1097 (852 kaj 245), en 1926 1415 (947 kaj 468), en 1927 1467 (868 kaj 599), en 1928 1331 (868 kaj 463), en 1929 1397 (948 kaj 440), en 1930 234, en 1931 372, en 1932 697, en 1933 826 anojn. En 1928 el la 868 aktivaj anoj estis 699 viroj kaj 169 virinoj; la subtenantaj anoj estis ĝenerale kurŝanoj.

La sinteno de la magistratoj ne estis unueca rilate al E. Ekz. HESL laŭ interveno de la soc. dem. partio ricevis de la ĉefurbo de 1926 ĝis 1931 iaran subvencion, sed samtempe en multaj provincaj lokoj diversaj magistratoj malhelpis la organizon laboron. Eĉ la neŭtrala HES devis plendi kelkfoje. En 1923 oni anoncis el Debrecen, ke la »grupfondiĝon malhelpas la konduto de la polico kaj oficialaj rondoj.« En 1925 la departementa magistrato malpermesis la fondon de HES-grupo en Mezökövesd kaj la motivoj estis i. a., ke la klereco de la loĝantaro havas tiel primitivan gradon, ke eĉ la elementa instruado ne havis kaj ne havas la deziratan rezulton; ke la instruarojn oni uzos eble por distastigi kontraŭstatajn klopodojn ktp.: kaj la direktoro de la loka realgimna-

zio ne donis ejon por kurso, »ĉar la E-istoj estas komunistoj«.

Ĝenerale ĉefe en la unuaj postmilitaj jaroj la kvinpinta verda stelo kaŭzis multajn suspektojn, eĉ kelkfoje ofendojn. Mem la laborista societo konstante plendis pro burokrataj malhelpoj kaj kelkaj socialdemokrataj deputitoj — Anna Kéthly, F. Reisinger, K. Peyer, L. Kabók kaj G. Malasits — parolis pri la malhelpadoj en la parlamento. Ili menciis ankaŭ la motivojn de la malpermesoj, ekz. »la loka grupo en Pécs havas nur 26 tiujn anojn, kiuj havas anoncitan loĝejon, pro ĉi tiu malgranda anaro la loka grupo ne povas servi la komunan intereson, eble nur la individuajn interesojn de la anoj;« (1927); »estas pli necesa la instruado de la hungara lingvo kaj la ortografio;« (Tótkomlós, 1927); »la laboristaro havas tute sufiĉan terenon por la memklerigado eĉ krom la scio de E;« (Pomáz, 1927); »la E-istoj antaŭvideble interrilatiĝos kun eksterlandanoj;« (Orosháza, 1929) »kurso en privataj loĝejoj ne estas permesbla pro higienaj motivoj kaj ankaŭ pro tio, ĉar tie la polica kontrolo estus neebla;« (Ujszentiván, 1927). Kelkloke oni konfiskis eĉ la E-lernolibrojn, ekz. en Miskolc en 1925. (Vidu: H. Heroldo, 1929. B. 6. Halka: Historio de HESL). En 1928 la estraro de la vilaĝo Csév alvokis la Naturamikan Societon en Ujpest, kiu apud la vilaĝo konstruis »Esperanto-fonton«, ke la fonton oni senprokraste malkonstruu kaj la E-subskribon oni deprenu aŭ la fonto ricevu alian nomon. Nur post unujara batalo oni sukcesis savi la E-surskribon, sed la fonton mem kelkaj vilaĝanoj detruis. Plej interese estis, ke la ministerio por internaj aferoj ne konfirmis la regularon de la H Oficista E-Ligo, kiu fondiĝis 30 okt. 1927, kaj kies preskaŭ ĉiuj anoj estis konservativuloj.

Sed ne ĉie kaj ĉirilate montriĝis nekomprenemo aŭ malamikeco, restis multaj eblecoj por la laborado. En 1926 la organiza forto de HES grave refalis, »H E-isto« ĉesis aperi, ankaŭ H E-Instituto bankrotis kune kun L M, kiu reaperis nur en 1931; jam en jan. 1926 fondiĝis la gazeto H Heroldo (Lajos Kókény), 22 jun. ĉefe

laŭ iniciato de deputito Frühwirth H Katolika E-Societo, kelkaj famuloj, kiel Rákosi, Karinthy, Vikár, Surányi, Hegedüs, Falu aperigis amikajn artikolojn pri E.

La fremdultrafikaj oficejoj kaj la Int. Foiro eldonis jaron post jaro tre multajn prospektojn. La prospekto de la *Cefurba Fremdultrafika Oficejo* (Budapest, V., Deák Ferenc-u. 2.) »Vizitu Budapeston, la Reĝinon de la Danubo« en 1931 aperis en 20.000 e-roj kaj ankaŭ en la antaŭaj kaj postaj jaroj oni eldonis grandegan kvanton da prospektoj, ekz. la »Plano de Budapest« kun detalaj klarigoj aperis en 1931 en 5.000 e-roj. La *Budapeŝta Int. Foiro* (V. Alkotmány-u. 8.) laŭ sia oficiala komunikilo ricevas jare ĉ. 1.000 leterojn kaj kartojn en E kaj en 1932 la eldonnombro de la E-lingvaj afiŝoj, prospektoj, kalendarretoj, glumarkoj superis 45.000. Per la E propagando la Foiro ricevas vizitantojn precipe el la najbaraj landoj. Ambaŭ institucioj estas kontentaj pri la uzo de E kaj tiu ĉi daŭra sukceso estas dankebla precipe al Balkányi.

En 1928 kelkaj kongresoj (stenografia, fremdultrafika, finn-ugra) donis bonan okazon paroli pri aŭ en E. La Fontaine Literatura Societo aranĝis dufoje sukcesajn E-konzertojn. Mezeŭropa Konferenco de E en Budapeŝto en 1928 akcentis la int. rilatojn de E. Dumtempe multaj grupoj de HES disfalis, inter la restintaj la grupo en Debrecen sukcesis akiri sufiĉan aŭtoritaton, eĉ ĝeneralan helpon de la loka gazetaro.

Komence de aŭg. 1929 estis abunda rikolto de la multaj semadoj: la UK en Budapeŝto venigis ĉ. 1000 eksterlandajn samideanojn krom la enlandanojn. Granda aro da laboruloj, inter ili ĉefe la prez., József Mihálik, sekretarioj Pál Tolnai kaj Balkányi, la kas. Elek Tolnai, faris certa la eksterordinaran sukceson. Kvankam ne ĉiuj magistratoj helpis la gravegan fremdultrafikaran aranĝon, aliaj kontribuis sufiĉan subtenon, eĉ subvencio de la ĉefurbo kaj de la ministerio por edukado. La kongreson oficiale invitis la ĉefurbo kaj la Societo Budapeŝto-Banurbo. Kiel kutime, tre multaj altranĝuloj aŭ famuloj estis patronoj (nur

la ŝtatestro ne akceptis) aŭ honoraj anoj, la gazetaro skribis multe pri la kongreso, la plej amika sinteno montriĝis ĉe la gazeto »Magyarország«, kiu esprimis ĉiutage unu-dupaĝajn artikolojn dum la kongreso en H kaj E lingvoj. La filmoficejoj faris kino-filmon, la radio peris koncerton kaj intervjuon de fremduloj. Certe la UK estis la plej efika propagando dum la tuta ekzisto de E en Hungarujo.

Similaj, sed relative malgrandaj aranĝaĵoj, kiel la XV-a Katolika Kongreso en 1930 (d-ro Lukács kaj István Zöldy) kaj la postkongreso en 1931 (Béla Szász kaj d-ro F. Szilágyi) estis ankaŭ sukcesaj. La enketo, aranĝita de la »H E-Jarlibro«, en 1931, pruvis, ke E jam havas multajn amikojn inter la verkistoj, scienculoj kaj pedagogoj. HES ricevis en 1930 subvenciojn da 2.000 pengoj de la ĉefministerio, 800 pengojn en 1931 de la ĉefurbo.

Tamen en kelkaj rilatoj ĝi ne havis sukcesojn. Ekz. la instruado en mezlernejo estas permesata per ministra ordono jam de 1920, sed ĉiujare oni instruis E-n nur en kelkaj lernejoj kaj kun malgranda sukceso. Kaŭzoj: laŭ la ordono HES rajtas aranĝi kursojn por la lernantoj, sed ne rajtas postuli lernkotizon kaj la ministerio ne publikigas la permeson en sia oficiala organo. Alia grava batalkampoj estas la radio, sed ĝis nun oni dissendis nur kelkfoje E-paroladojn.

Multe pli sukcesa estas la laboro ĉe la skoltoj, nova tre sukcesa tereno de Balkányi. En 1931 estis malgranda int. tendaro apud Budapeŝto, oficiale invilita de H Skolta Federacio. De 1931 oni aranĝis multajn kursojn inter la skoltoj, por uzi ĝin dum la mondendaro en aŭg. 1933 en Gödöllő (apud Budapeŝto); la jamboreo alportis rimarkindan sukceson por E.

En sept. 1932 laŭ iniciato de HES (Kökény) fondiĝis E Ekzamena Komitato, sub prezido de eksministro d-ro Agost Benárd. En okt. 1932 la H E-Muzeo en Nagymaros fondiĝis sub gvidado de d-ro József Takács (ĉefsekr. kaj gvidanto de la HES-laboro ĝis 1927). En dec. 1932 J. Mihalik fondis la HE Pedagogian Societon. En febr. 1933 aperis grava verko, la Hun-

gara Antologio, unu el la plej valoraj samspecaj libroj. En majo 1933 la hungara poŝto laŭ iniciato de la ĝeneraldirektoro barono Szalay eldonis oficialajn poŝtkartojn kun E-teksto. E estas daŭre uzata ankaŭ en la stenografaj oficejo de la parlamento, kie kun subteno de la ĉefo d-ro Siklóssy oni aranĝis pere de E int. profesian enketon kaj fondiĝis kolekto de profesiaj dokumentoj.

Malgraŭ la krizaj tempoj kaj ĉefe la senlaboreco, E ŝajnas konservi sian ĝisnunan staton, eĉ sukcesoj montriĝas en diversaj rilatoj, sed la nuna socia kaj politika stato ne donas esperon por rapida progreso de E en Hungarujo.

Suplemento. E-istoj, kiuj multe laboris antaŭmilite (krom la menciataj aliloke): en Pozsony István Nagy Molnár, Emil Wanitsek, Rezső Spalek, István Krausz (Kéthelyi), kaj d-ro Mátyás Dobrovits, en Arad d-ro András Végh, József Czukor, Béla Kardos, en Bártfa d-ro Vilmos Austerlitz, en Déva s-ino Bottyán, en Fiume Tódor Kovács, en Győr f-ino Berta Jurássy, en Hátszeg Béla Muzsnay, en Kaposvár majoro József Tihanyi, S. Rónai, en Kíspeszt István Széchenyi, en Kolozsvár Imre Rákóczy kaj Otto Amon, A. Biró, en Komárom Ferenc Kády, en Nagykovács prof. Endre Bánóczy, Antal Khirer, en Nagyszombat Leó Dévay, en Petroszény Lajos Jámbor, en Pécs Aladár Tóth, en Sopron prof. Antal Zsigmond, en Szabadka f-ino Etelka Sátor, en Szeged Lajos Szücs, Péter Turzó, en Temesvár Alfréd Bambach, Márk Pavlovits, en Ujvidék f-ino Adél Nemessányi. — En la unuaj postmilitaj jaroj en Vác Rafael Bartal, en Miskolc la fratino Györi-Nagy, poste prof. Lajos König, en Diósgyőrvasgyár L. Szabó, en Füzesabony Ernő Reinitz, en Győr György Steiner estis la gvidantoj de la laboro. — Pluaj fervoraj anoj de ERA estis: László Zimmermann, d-ro József Mátéffy, Imre Rédey, Erzsébet Székely, Károly Bodó, Lajos Totsche. — Ĉefaj centraj gvidantoj de HESL estis de 1918: Mihály Zsamboky, Gyula Kéthely, Áron Mészáros, János Tomán, K. Schreiter, Artur Schwarcz, János Sturm, László Izsó, Leó Hercz, Béla

Schuller, Ferenc Csikós, József Nagy, József Batta, György Tóth, Katalin Hámán, Ferenc Polgár, Vilmos Bleier, Béla Bleier, Ferenc Farkas, Béla Farkas, Tibor Czitrom, Boriska Szerémi, Andor Glancz, Miklós Kertész (parlamentano), Ernő Langfelder, Ferenc Kabók, Imre Baranyai, Dezső Sándor, Ferenc Prohászka, Károly Stern, Sándor Berger, Antal Schlesinger, Géza Horváth, Ferenc Braun, Zoltán Fürst, Gyula Piller, Pál Sztricskovics, Zsigmond Tieder, d-ro Ferenc Szilágyi, Géza Zachár, Ede Gischitz, Antal Szilágyi; en provinco: Imre Tombác (Szeged), Ferenc Korányi (Szombathely), Sándor Szalay kaj József Tóth (Kaposvár), Mihály Szverlet, Pál Dobrovsky (Orosháza), József Ruzsics (Pécs), Róza Szatmári (Hódmezővásárhely), Piroska Hádel (Békéscsaba), László Tóth kaj Lajos Kiss (Debrecen), Imre Gold kaj László Bergl (Győr), Péter Butry (Tatabánya), János Dancza (Eger) ktp. — Ĉefaj laborantoj ĉe la neŭtrala movado en Debrecen: Péter Török (mortis), d-ro István Joó, Géza Berki, d-ro Gyula Zempléni, József Mátyás, József Bozczán ktp.

Societoj. — HES. Patrono eksministro d-ro Georgo Lukács, prez. Fr. Karinthy, afergvid. vicprez. Kökény, vicprez. d-ro Loránd, ĉefsekr. kaj prokuroro d-ro Jenő Szilágyi, sekr. Miklós Klein, kontr. Elek Tolnai, bibl. s-ino Sári John, red. d-ro Takács, klubmastro Mária Kleinberger. Enspezoj en 1931 651.26 P (kotizoj 388.30 P), en 1932 721.53 P (kotizoj 665.— P). Elspezoj en 1931 1537.68 P, en 1932 1267.11 P. Stato de la centra biblioteko 980 volumoj.

HESL. Prez. Arthur Schwartz, sekr. Ede Gischitz, red. László Bergl. Komitatanoj: János Csuti, Jenő Molnár, József Gémesi, Zsigmond Papp, Károly Finszler, Károly Szabó, Károly Ernst, Gyula Szekeres. HESL laboris ĝis febr. 1934 en la kadro de la socialdemokrata partio kaj de la sindikatoj; tiam la nomitaj faktoroj »pro materialaj kaj rilataj moralaj kaŭzoj« eksigis la societon kaj plimulto de la socialistaj E-istoj nun agadas en la partio kaj sindikatoj por E.

Katolika ES. Prez. M. Früh-

wirth, vicprez. St. Zöldy kaj d-ro A. Marczell, ĉefsekr. Imre Károly Kovarc.

H E P e d a g o g i a A s o c i o. Prez. Mihalik, vicprez. s-inoj Szvoboda kaj Ilona Barabás (Reiszmann), ĉefsekr. István Ferenczy, kas. Valéria Péteri (Poltzer).

E-Sekcio de H Nacia Aso-cio. Gvidanto d-ro St. Puskás, anoj Zöldy, Marczell, Kovarcz.

Skolta E-Rondo. Prez. O. Schelken, gvidantoj. P. Balkányi kaj I. Papp, sekr. Garam, Thuránszky kaj Ritter.

Literaturo. Aŭtoroj de prop. broŝuroj: Altenburger, Boda, Kovács, Kókény, Lombos, Marich, Mihalik, Pázmány, Schuller, Takács, Tholt, Tieder. — Aperis 40 diversaj lerniloj H-aj. Aŭtoroj de la pli gravaj lernolibroj, Baghy, Bánó, (ankaŭ por blinduloj), Barabás, Lengyel, Medgyesi, Polgár, Szilágyi, Török, Lernolibro de HESL; tiuj de vortaroj: Takács (E-H, H-E), Tomán E-H, H-E), Török, Schatz. — Pli gravaj tradukaĵoj el la H literaturo: H antologio, red. de Kalocsay, Madách: Trag. de l' Homo, Petőfi: Johano, la brava: Karinthy: Morgaŭ matene; ĉiuj tri trad. de Kalocsay; Karinthy: Norda Vento; Babits: La cikonikalifo, ambaŭ trad. de Bodó; Herczeg: La marĉfloro, trad. de Göttl; Mikszáth: La fantomo de Lubló, trad. de Forster; Jókai: Du noveloj, trad. de Lutzenbacher, ktp.

R i m a r k o. La artikolon tralegis aŭ kompletigis Baghy, Balkányi, König, Loránd, Rózsi Tolnai-Göndör.

J. TAKÁCS.

Hura. Romano, originale de Baghy. 1930, 411 p. »La aŭtoro intencis pripensigi nin, trakti gravajn sociajn etikajn problemojn, sed elektis formon ironian, amuzan, eĉ burleskan; tiu ega kontrasto inter la seriozaj kaj humoraj partoj estas la ĉefa trajto de Hura. La dueco, kiu tute apartigas la romanon, estas ĝia diskutbla propraĵo. Bona stilo, ofta je lertaj esprimoj kaj trafaj parolturnoj.« (G. S., 'E', 1931, p. 42.)

Huyng ba Duong, anamano, poŝt-oficisto. Nask. 5 marto 1910 en Hué.

Aktiva propagandisto en Hindociĉnujo, prof. de E-a kurso per la lingvo anama, kaj de perkorespondanta kurso en anamaj gazetoj. Lernolibro anama-E (Hanoi 1932).

Hvorslev (vorsleü) Carl Adolph, dano, instruisto de natursciencaj fakoj en Aarhus. Nask. 10 jun. 1880 en Rindsholm. E-isto de 1912. Energia propagando skriba kaj buŝa. Estrano de la loka grupo kaj landa societo. Ano de la ekzamena komisiono.

Hyams H. B. (ps. Tagulo) anglo, arkitektura designisto kaj pentristo. Kunlaboris al Int. Socia Revuo, al Antaŭen, LEA-organo germana, kaj post la milito al Sennacieca Revuo; Literaturo. Verkis originalan romanon, Nova Sento, (1915), kiu havigis al li niĉeton en nia literatura historio, ĉar kun la antaŭmilitaj romanoj de Vallienne kaj Luyken ĝi helpis konduki nian originalan literaturon el ĝia legoteksta junaĝo. Tagulo ĉefe inspiris liaj teozofiaj konvinkoj pri la esenco de la vivo, sed Nova Sento propagandis plurajn ideojn malpli mistikajn, kiuj poste trovis pli ĝeneralan atenton, eĉ aprobon, ekz. la Ligo de Nacioj, senarmiĝo, vegetarismo, socialismo kaj certaj reformoj malliberaj, kiajn oni jam aplikas en Sovetlando. Entute la ismoj ŝajnas fantazie miksitaj en lia romano, sed aparte ili prezentas multon pripensindan. La animo de londona senlaborulo teozofie reenkorpiĝas sur Marson, kie Tagulo imagis sian utopion. Memorante la mizerojn, kiuj malbeligas la homan »civilizon«, la reenkorpiĝito povas kontrastigi ilin kun la feliĉa socio, kiun la marsanoj konstruis per racia ekonomio kaj simpligita vivmaniero.

W. B. JOHNSON.

Hyde (hajd) Arthur Maurice, (ps. Antoni Delsudo), anglo, ŝtatifocisto. Nask. 5 apr. 1891 en Melbourne. Prez. de AEA, 1921. Starigis E kurson inter ĉinoj en Nov-Gvineo. Aŭtoro de lernolibro, 1918; Aŭstralia: Lando kaj Popolo, (kunlabore kun Lauri Laiho, finno), 1927. La unua red. de La Suda Kruco.

Habibi Aĥmed, sovetiano, tataro, instruisto kaj redaktoro, prop-isto de E inter tataroj kaj baŝkiroj. Nask. 18 sept. 1893 en vilaĝo Janasal apud Tetjuŝi (Tatario). E-isto de 1914. Ĉefo de Baŝkiria Literaturadministrarejo en Ufa, membro de CK SEU, sekr. de B-a komitato de SEU.

Hajan Hirob Namĝilob, mongolo, unua pioniro de E inter mongoloj. E-istiĝis dum sia vojaĝo en fremdaj landoj — Turklando, Sovetunio 1920—23. Reveninte Mongolujon 1924, li propagandis tie E-n laŭpove en malfacilaj kulturkondiĉoj de sia nomada lando kiel estro de lernejo de la popolrevolucia partio en la ĉefurbo Ulan-Bator-Hoto (Urga).

Haralambev Hristo, bulgaro, oficisto. Nask. en 1881 en Tirnovo, mortigita dum la balkana milito de 1912 en la batalo apud Bunar Hisar. Studis teologion en Rusujo, el kie en 1900 revenis kiel bona E-isto kaj fervora propagandisto. Animigis la grupon »Lumo« en T., gvidis multajn kursojn,

red. la gazeton Lumo en 1907—08 kaj estis samtempe prez. de BEA.

Hesapĉiev Simeon St., bulgaro, studento de slava filologio. Nask. 16 apr. 1910 en Sevlievo. Red. de B. E. dum 1931—33. Multaj paroladoj, preĉipe en gimnaziaj rondoj. Prilingvaj artikoloj.

Hrima (Hristo Marinov), bulgaro, laboristo. Nask. 1907 en vilaĝo Gorno Brodi ap. Seres, Makedonio, frue orfiĝis en infanaĝo kaj pasis krudan vivon. Aŭtoro de la originale en E verkitaĵoj: Poemo de P plugisto, poemaro, (1930), Ĉe abismo, rakontaro, (1931) kaj Du frontoj, novelo (1932).

Hristoskof Nikifor, bulgaro. Nask. en 1888 en Bulgarujo, mortis 25 jara dum la milito bulgara-rumana en 1913. En 1909 pro sia Tolstoja kredo devis forlasi B-ujon, iris al Rum-ujo kie li fariĝis sekr. de Robin kaj de RES; alportis multon al la disvastigo de E. Kunlaboris al R. E-isto, LI k. a., red. de Danubo ĝis la ĉeso.

IAEF: Int. Asocio de E-istaj Fervojistoj. (v. Fervojistoj.)

IAES: Int. Asocio de E-istaj Stenografistoj. v. Stenografio.

IALA, usona asocio »Int. Auxiliary Language Association«. Estas fondita en 1924. »Ĝi estas neŭtrala asocio, celanta la starigon de unu helplingvo, simpla kaj klara, instruita en ĉiuj landoj apud la naciaj lingvoj. La laboroj de IALA etendiĝas sur du ĉefaj kampoj: klopodoj por interesi pli grandajn rondojn pri la mondlingva movado, kaj esploroj. La eduka esploro celas 1, instigi al starigo de eksperimentaj kursoj kaj trovi por la instruado de helplingvo (ekz. E) la plej oportunan lokon en la programoj de edukaj institutoj; 2, determini kaj taksu la progresojn faritajn en la lernado de helplingvo kaj kompari ilin kun tiuj faritaj en lernado de naciaj lingvoj dum egalaj periodoj; 3, prepari materialon por eksperimentaj kursoj, studi uzatajn lernolibrojn laŭ ilia relativa valoro. ... En Usono tiun studon entreprenis la Instituto de Eduka Esploro (»Columbia University«). En Eŭropo simila tasko estas gvidata de prof. Bovet, dir. de la Instituto de l' Eduksciencoj, Genève kaj de prof. Dietterle, Leipzig. La dua esploro de IALA tuŝas la lingvan fakon. Tiu rilate estis farita granda paŝo antaŭen per la organizo de la Int. Konferenco por Lingva Studo, kiu okazis en Genève de la 20-a de marto ĝis la 2-a de apr. 1930... Trie, la sociologia esploro celas klarigi la bezonon de helplingvo, konigi tion al interesataj sferoj, enketi pri la nuna multlingva haoso en int. kongresoj.« La

ĉefa laboranto de IALA estas s-ino Alice V. Morris. (Mallongigo de la artikolo en UEA-Jarlibro 1931, p: 53—56. L. ankoraŭ artikolon de Dietterle en Int. Ped. Revuo, 1928, apr-majo, p: 6—17.)

IAREV: Int. Asocio de Revoluciaj E-Verkistoj.

ICK: Int. Centra Komitato (de la E movado). (v.)

Iddon Lizzie, angliano. Nask. 12 aŭg. 1887 en Accrington. Fondis grupojn en Southport kaj Accrington. De 1910 E instruisto. Kroniĝis »Reĝino« kun ora medalo ĉe Literatura E Konkurso por originala versaĵo, 1914.

Idiom-Neutral. Projekto de int. lingvo, (1898) ellaborita de Akademio, elektita de la Pariza kongreso de Volapükistoj. Idiom-Neutral estis bazita sur int.-eŭropa leksika materialo kaj ĝi konservis de Volapük nur la simplecon de ĝia gramatiko kaj de ĝia aglutina strukturo, pliadaptita al la tradicioj de eŭropanoj. Sed Idiom-Neutral ne sukcesis ricevi eĉ unu procenton de tiu sukceso, kiun siatempe ricevis Volapük. Reguligante la lingvo-evolucion per limigita kolektivo, la Akademio eliminis la eblon de normala libera evoluo, difinata per la skalo de la kresko kaj per la bezonoj de la uzado, do la lingvo dependis de ĝiaj aŭtoroj. Rezulte, la apliko de Idiom-Neutral estis limigata per la rondo de la Akademianoj mem, kreintaj la lingvon. Tiu fiasko havis ankoraŭ unu kaŭzon: tiutempe la amasoj, kiuj havis intereson por la int. helpa lingvo, jam grupiĝis ĉirkaŭ E.

Ido. La sistemo Ido aŭ Reform-E estas publikigita de la t. n. »Delegitaro por la akcepto de L. I.«, kiel ĝia ko-

lektiva verko. Unu el la ĉefaj gvidantoj de la tiama E-a movado, L. de Beaufront, poste montriĝis ĝia ĉefaŭtoro, aŭ estis proklamita kiel tia.

La Ido-gvidantoj celis anstataŭi la »liberan«, tio estas kolektivitan, »popolan« kreadon de la int. lingvo per regulado fare de Akademio, konsistanta el limigita grupo de kompetentuloj. Kaj estas karakterize, ke dum preskaŭ 20% da E-gvidantoj aliĝis al la lingvo, el la E-istaj amasoj ĝi povis altiri apenaŭ 3—4%. La grandega plimulto de la E-istoj ĝuste taksis la forton de la libera evoluo kaj malkonfide rilatis al ĉiuj provoj reformi kaj reguli la lingvon desupre. (Ni memoru pri simila malsukceso de provoj samaj koncerne al Volapük kaj Idiomo-Neutral). La »desupra revolucio« fiaskis per la fideleco de la amasoj. Jen kio plej bone montras la internan forton de E. En ĝi povas ekzisti nur iom-post-ioma, natura evoluo, sed nepre ne perforta rompo aŭ ŝanĝo. Ĉiujn similajn »provajn« la E-istaro eliminis el si mem.

Ido ankaŭ dum sia plua ekzisto ne sukcesis malhelpi la progreson kaj disvastiĝon de E. Dudek jarojn post la nasko de la lingvo, en 1927, la Ido-ĉefoj, perdinte la esperon pri la triumfo de sia afero kaj estante tro miopaj por vidi la sociajn kaŭzojn de la fiasko, komencis serĉi ties kaŭzojn en la lingvostrukturaj mankoj de Ido. Rezulte aperis dudeko da novaj lingvo-projektoj, kies aŭtoroj sin lasis rekonduki en la epokon de la individuisma utopia projektado. Ili ne povis rekoni la eble plej genian principon de Z: fari nur fundamenton kaj lasi al kolektivo la ellaboron: la konstruon de la lingvo-palaco.

Krom tiuj supre menciitaj kaŭzoj, Ido fiaskis precipe pro la arbitreco de sia deriv-sistemo. Tiu ĉi sistemo estas tute teoria. Se Ido estus disvastiĝinta kaj uzita de vastaj amasoj, ĝi nepre estus formatinta tiun ĉi deriv-sistemon per si mem kaj estus iom post iom reveninta al la libera kaj natura derivado de E.

Ido kaj Esperanto. (Principa kontraŭeco). Ĉiu reklamisto scias, kiel grava estas trafa elekto de la nomo por la reklamota afero: multaj komercistoj kaj industriistoj dankis sian suk-

ceson nur al ia lerte elpensita titolo aŭ reklama frazeto.

La kreintoj de Ido, elektante tiun nomon por la nova lingvo, montris, ke ili estas almenaŭ tre lertaj reklamistoj, ĉar la plej efika batalilo de Ido kontraŭ E estas ĝuste tiu ĉi nomo »Ido«, kiu erarigas eĉ ankaŭ kelkajn E-istojn, kredigante, ke la lingvo Ido estas ja ido kaj filo de E bazita sur tiaj samaj principoj, kiel la patro, kaj diferenciganta nur per flankaj, malĉefaj, facile ŝanĝeblaj detaloj. Memkompreneble ŝajnas, ke Ido, estante nur posta formo de E, estas pli perfekta ol ĝi, ĉar la filo, naskiĝinte pli malfrue, povis profiti la antaŭan sperton de la patro kaj evoluante pliboniĝis.

Tio estas malveraĵo. Ido ne estas nek povas esti filo de E; ĝi eĉ ne estas nek povas esti bastardo de E, pro tio, ke, estante bazita sur principoj ne nur tute diferencaj je tiuj de E, sed eĉ tute kontraŭaj al ili, ĝi ne apartenas al la sama lingva familio. Tiun malsamfamaliecon kaj absolutan kontraŭecon estas facile konstati, konsiderante la principojn de E kaj komparante ilin al la principoj de Ido:

1. **Primetoda principo:** Praktikeco.

Z ĉiam juĝas la lingvajn demandojn el vidpunkto praktika, ne teoria; li ĉiuokaze rezonas kiel multsperta lingvuzanto. »Neniam gvidu vin, li diras, per konsideradoj teoriaj, kiel ajn belaj ili ŝajnas... Senfrukta kaj danĝera estas la sekvado de teoriaj principoj, se ni ne demandas nin, kian praktikan signifon ili havas. Tio, kio en la teorio ŝajnas tre bona kaj trovas aprobantojn, en la »praktiko ofte havas nenian signifon.« La sperto sciigis al li, ke ĉiuj idealo de perfekteco estas nur individuaj, pli malpli arbitraj, kaj aliĝas kun la personoj tiamanjere, ke neniam akordiĝo estas jam elektivebla inter la diversaj teoriistoj; nur la neeviteblaj bezonoj de la praktika uzebleco kapablas trudi vole nevole al ĉiuj komunajn kondiĉojn kaj nediskuteblajn regulojn.

Male, Ido ĉiam juĝas la lingvajn demandojn el vidpunkto abstrakta kaj teoria; ĝi konstante rezonas kiel matematikisto aplikanta al la lingvaj, nature malsimplaj, multflankaj kaj interplektitaj aferoj la rigidan, sencedan kaj

senkompromisan, tie ĉi netaŭgan, matematikan metodon. Ĝi celas lingvon konforman al nure teoriaj principoj, lingvon idealan kaj teorier perfektan.

2. Ĉefa principo: Facileco.

Z persiste opinias, ke la unua kaj plej grava kondiĉo por lingvo int. estas la plej eble granda facileco. Estas nepre necese, li ripetis multfoje, »ke la lingvo estu eksterordinare facila.« Li rigardas la internaciecon de la vortaro nur kiel unu el la diversaj uzebaj rimedoj por atingi la plej grandan facilecon.

Male, Ido rigardas la internaciecon de la vortaro kiel la plej superan kaj esencan regulon de la int. lingvo kaj kiel absolutan senkondiĉan principon. »Parolante nur pri la necesega facileco de la int. lingvo, oni malprave silentas pri la esenca principo: la internacieco de la formantaj elementoj... Ĉiuj radikoj devas esti kiel eble pej internaciaj... La lingvo int. devas submeti sin plej severe al la regulo de internacieco, eĉ de la maksimumo de internacieco... La maksimumo de internacieco estas la idealo de la lingvo.«

3. Dua principo: Facileco por ĉiuj.

Difinante la facilecon, pri kiu li parolas, Z precizigas sian penson: la lingvo devas esti kiel eble plej facila »por ĉiuj«, eĉ »por nek'eruloj«. Li klare konscias pri la malsameco inter la facileco, kiun li celas, kaj la facileco, kiun celas Ido: »Tute ne estas bezone, li diras, ke, kiel opinias multaj pli novaj projektistoj, la instruitaj lingvistoj povu tuj kompreni tekston skribitan en lingvo int. En tia afero la instruitaj lingvistoj ludas la lastan rolon, ĉar por ili ja tia lingvo estas malpleje bezona.«

Male, Ido en siaj propagandiloj precepte fieras pro tio, ke, »estante tre analoga al E ĝi tamen superas E-n pro sia tuja komprenebleco«. Sed la idistoj forgesas aldoni, ke tiu ĉi mirinda tuja komprenebleco, aŭ, pli ĝuste, divenebleco, koncernas nur la »poliglotalojn«.

4. Tria principo: Derivado ne ekzistas en E.

Ĉar »en nia lingvo ĉiu parto gramatika prezentas apartan vorton«, la malsimplaj vortoj estas nepre formataj nur

per kunmetado, neniam per derivado. Sekve neniu ajn regulo pri derivado, kiel ekzemple la regulo pri renversibleco, povas koncerni E-n. Couturat plene eraras kaj erarigas la legantojn, kiam li asertas, ke »la sistemo de la derivado en E estas sendispute la plej karakteriza trajto de tiu lingvo.« Kontraŭe, la plej karakteriza trajto de nia lingvo estas ĝuste la neekzistado de iu ajn derivado. Neniam pri ia derivado parolis Z, kaj, en 1913, la Akademio oficiale deklaris, »ke la vortfarado de E estas fondita sur la konstruo de ĉiu aparta vorto kaj ne sur tiel nomitaj reguloj de derivado.«

Male, en Ido la derivado estas la plej grava kaj plej ofta procedo de vortfarado kaj Couturat verkis specialan »traktaton pri derivado en E« konscie aŭ nekonscie konfuzante siajn proprajn teoriojn kun la ideoj de Z kaj malprave altrudante al E procedon, kiun efektive ĝi ne konas, kaj regulojn pri derivado, kiuj tute ne povas konveni al lingvo ne uzanta la derivadon.

5. Kvara principo: Senabsoluteco kaj senrigideco de la principoj kaj reguloj. Z, ĉiam celante kontentigi ne la postulojn de abstraktaj teorioj, sed la malsimplajn diversflankajn bezonojn de la praktiko, konstante ripetis la konsilon: »Ĉio devas esti en ĝusta mezuro«, kaj li aplikas tiun ĉi rezervon al ĉiuj principoj kaj gvidreguloj. Oni devas »kunigi kaj konsentigi inter si diversajn principojn... E kontentigas ĉiun principon laŭ mezuro de ebleco, penante plej zorge, ke ĝi ne kontraŭagaŭdu al aliaj pli gravaj principoj.« Li opinias, ke lingvo int. devas kontentigi ne nur la postulon pri logikeco, aŭ ian ajn alian postulon, sed ankaŭ »ĉiujn aliajn postulojn, kiuj povas esti farataj al lingvo int.« kaj kiujn tute ne zorgas la Idistoj, ekzemple la »naturecon, vivipovecon, flekseblecon, sonorecon, k. t. p.«

Male, Ido rigardas siajn principojn kiel nepre absolutajn kaj senkondiĉajn kaj, laŭ la rimarko de Z mem, ĝi »penas plibonigi unu ian flankon de la lingvo, oferante por tio ĉi ĉiujn aliajn flankojn.«

Tiun ĉi superan ĝeneralan regulon de »ĝusta mezuro« Z precize aplikas mem al kelkaj apartaj demandoj, lo-

gikeco, komuna uzado, unusignifeco, idiotismoj, k. t. p.

Li malkonsilas la »tro grandan logikecon«, li ne akceptas la logikajojn, »kontraŭ kiuj protestas lia lingva sento«; li rekomendas, ke »nia lingvo ne estu tro preciza, ĉar tiam ni nin mem katenus... Ĉar la tute esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur interkonsento, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi pli gravan rolon ol seka teoria logikeco... Ne sole en naturaj lingvoj, sed ankaŭ en lingvo artefarita ĉio, kio estas uzata de la plimulto de bonaj verkistoj devas esti rigardata kiel bona, se ĝi eĉ ne estas absolute logika; ĉar se ni postulos ĉiam nur logikon absolutan, tiam la libera uzado de lingvo fariĝos tute ne ebla.«

Sammaniere, kvankam Z rigardas la unusignifecon de la vortoj kiel ĝenerale taŭgan kaj preferindan, kvankam li plej ofte unusignifigis la radikojn, tamen tiun ĉi regulon li aplikas ankaŭ »en la ĝusta mezuro« kaj sen ia absoluteco. Tial troviĝas en la Fundamenta Universala Vortaro kelkaj radikoj, kiuj estas nur ŝajne unusignifaj, ĉar ili estas tradukitaj per nacia vorto, kiu estas plursignifa. La Vortaro de Bein kaj la Plena Vortaro de SAT eĉ apartiĝas per ciferoj la diversajn signifojn de la plursencaj radikoj.

La samo fariĝas pri la idiotismoj: kvankam Z konsilas traduki la naciajn apartaĵojn per esprimoj klaraj por ĉiuj kaj internacie kompreneblaj, tamen li ne ekstermas senkondiĉe la idiotismojn, t. e. la ne plene logikajn esprimojn. Li tute precize deklaras, ke »ankaŭ en E troviĝas diversaj idiotismoj, kaj tute malprave kelkaj E-istoj ilin kontraŭbatalas, ĉar lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo sen vivo kaj tro peza.«

Male, Ido tute ne zorgas pri interkonsento nek pri komuna uzado; ĝi konstante atentis nur la teorion rigidan logikecon, kiun ĝi ofte malprave konfuzas kun la klareco kaj facila int. komprenebleco; postulante severan unusignifecon, ĝi malpermesas la plursignifecon de la radikoj kaj vortoj: »Tio, kio distingas Idon, estas la absoluta interna neco. Ido ne estas bazita sur la komuna uzado, kiel la naturaj lingvoj, sed nur sur la logiko, kaj la tu-

tan logikecon de la lingvo konsistigas la principo de unusignifeco.« Ido pretendas absolute forigi la idiotismojn kaj, deklarante, ke »la idiotismo estas la plej danĝera malamiko de la lingvo int.« ĝi fieras, ke la »propra karakterizilo de tiu ĉi lingvo estas, ke ĝi havas nenian idiotismon, nek en la grammatiko, nek en la formado de la vortoj, nek en la frazeologio.«

Ni sekve rajtas diri, ke Ido tute malprave kaj malvere asertas, ke ĝi »ne estas nova lingvo«, ke ĝi estas »nur plisimpligita kaj plibonigita formo de E, kiu konservis la esencajn principojn al kiuj E dankas sian sukceson«. Ido estas lingvo kerne kaj esence diferenca de E, malgraŭ ŝajna supra kaj ekstera simileco; ĝi ne havas pli da rajto por pretendi sin plibonigita formo de E ol ekzemple la latina senfleksia lingvo de Peano aŭ la lingvo Apolema, aŭ Dilpok, aŭ Novilatin, aŭ iu ajn el la ceteraj proponitaj int. lingvoj, kiuj neniam reklamis sin idoj kaj formoj de E.

E. GROSJEAN-MAUPIN.

Idoj de Orfeo. Romano, originale de Bulthuis. 1923, 544 p. »Stranga aventuraro de tri ĝemeloj. Tre laŭdinda estas la celo de B. kaj rimarkinda lia terteco ĉiam interesi kaj vekigi scivolon. Simpla, vigla stilo.« (G. S., E', 1923, p. 183.)

IEWM: Int. E-Muzeo en Wien. (v.)

IES: Int. Esperanto-Servo, v.

Iĝigeno en Taŭrido. Dramo en 5 aktoj de Goethe, el la germana trad. Z. 1908, 108 p. »Traduko speciale farita por la teatra prezentado dum la Kvara Kongreso. Tie ĉi, kiel en Hamleto, du geniuloj renkontiĝis.« (L I, 1908, p. 381.)

Hida Yūtarō (juutaroo), japano, pentristo. Nask. 1866, mortis marto 1909 en Tokyō (?). Multlingvulo. Unue Volapükisto. Ĝis antaŭ la morto kompilis J-E Vortaron, la unua provo en J. sed ne eldonita.

IKA. Internacio Katolika. Organizaĵo por int. katolika agado, uzinta kaj parte ankoraŭ uzanta E-n. IKA fondiĝis en 1920 en Hago, ĝiaj kunlaborantoj venis el du grupoj: el la antaŭa Int. K. a. t. U. n. i. ĝ. o. E-ista (IKUE) ne plu funkcia de 1914 kaj

el la Mondpacigo Blanka Krucio fondita en 1917 de kat. pacifisto, kies int. korespondlingvo estis E kaj kiu publikigis (de 1918) E-gazeton *Blanka Krucio*. Ĉefoj de ambaŭ movadoj decidis fondon de pli ĝenerala IKA, kiu ne estu pure E-ista societo, sed en kiu E servu kiel unueca lingvo de la gvidantaro kaj de la oficiala organo *Espero Katolika*, kiun oni revivigis kaj kiu ricevis la benon de Papo Benedikto XV-a, kiam ĝi estis IKA-organo. Parto de la antaŭaj IKUE-anoj ne aprobis la eniĝon de sia movado en IKA, restarigis la antaŭan IKUE, kaj reprenis la revuon *E. K. IKA* fondis novan gazeton *Katolika Mondo* kiu aperis monate (dum du mallongaj periodoj dusemajne) de 1921 ĝis 1928, en 1914 kun aldono *Revuo Katolika*, en 1926 —28 kun aldono *La Juna Batalanto*. En la sekr.-ejo de IKA ekzistis Int. Katolika E-Oficejo kun profesia oficisto, kiu propagandis E-n. La *Paulus-Eldonejo*, Graz, eldonis serion da libroj en E kaj kelkajn lernkaj informbroŝurojn germanlingvajn pri E. — IKA-kongresoj okazis 1921 en Graz, 1922 en Luxembourg, 1923 en Konstanz, 1924 en Lugano, 1925 en Oxford, 1926 en Einsiedeln, 1927 kaj 1928 en Bregenz, 1929 en Budapeŝto, 1931 en Feldkirch. — IKA estis unu el la unuaj int. katolikaj movadoj; en ĝiaj kongresoj la fakaj kunsidoj por instruistoj, ĵurnalistoj, filmo, prizorgo de elmigrantoj ktp. donis valorajn instigojn kaj varbis por E. Iom post iom fakaj grupoj ekster IKA transprenis la laboron, la signifo de IKA malpliĝis, precipe de 1925, kiam pro financaj kaŭzoj la profesia oficejo kun pagitaj oficistoj (kiuj ĉiam estis E-istoj) fermiĝis. La E-laboro estis daturigata de speciala E-sekcio de IKA, kiu estis identa kun la gazeto *Katolika Mondo*. Hodiaŭ IKA estas studrondo por int. kaj sociaj problemoj, triono de la komitato estas E-istoj, la sekr.-ejo estas ĉe Msgr. d-ro teol. kaj fil. N. Pfeifer, Košice, Ĉeĥoslovakujo. La lokaj E-grupoj de IKA ne plu ekzistas, kelkaj transiris al MOKA. (v.)

W. SOLZBACHER.

Iks Voldiš: ps. de Šidlovskij. (v.)

IKUE: Int. Katolika Unuiĝo E-ista, v. Katolika movado.

ILEPTO: Int. Ligo de la E-ista Poŝt- kaj Telegraf-Oficistaro, v. PTT.

Iliado, Eposo de Homero, laŭ la rusa kaj germana tradukoj E-igis Kofman. 1895—97. 104 p. Ĉefverko de la mondliteraturo.

Ilo ps. de Lejzerowicz (v.)

ILO: Int. Labor-Oficejo, v.

Ilustrita Biblioteko. Eld. HDE Köln Formato 18×12½cm. Serio I enhavas rakontojn pri la »Oriento« (1927), Serio II pri la »Maro« (1928). Ambaŭ serioj havas po 5 kajeroj.

Imperiestro kaj Galileano. Du historiaj, filozofiaj dramoj de Ibsen: »Apostatiĝo de Cezaro« kaj »Imperiestro Juliano«, trad. Bulthuis. 1930, 276 p. »Ilin verkis I. por elverŝi sian pripensadon. La ĉeftemo estas la interbatalo de kristanismo kontraŭ la roma diaro. La E-igo bone plenumita.« (G. S., 'E', 1930, p: 118.)

Incertov Nikolaj Jakovlevič, sovetiano, ruso, oficisto. Nask. 1896. E-isto de 1911. Membro de CK SEU de post 1922. Tre aktiva aganto de la Sovetia E movado. Kunred. de la periodaĵoj de SEU. Membro de Lingva Komisiono de SEU kaj IPELK. Prez. de Centra oficejo de kontraŭ-religiuloj-E-istoj. Aŭtoro de l'instrua ruslingva broŝuro *Kiel devas labori SEU-ĉelo kaj de Senduloj kaj int. E korespondado* (sub ps. J. Ninov), 1930. Tradukinto kaj redaktinto de multaj E-eldonaĵoj ateistaj.

Indra. Talivaldo, latvo, cand. rer. merc., diplomita instruisto E-a. Nask. 14 sept. 1894 en Live apud Riga. Finis ekonomian fakultaton de Latva Univ. en Riga. Doganeksperto, nun instruisto en komerclernejoj. Vegetarano, abstinenculo. E-isto de 1914. Estrarano de Moskva ES 1915—1920, instruisto ĉe Moskva Instituto de E. Organizis en 1921 la movadon en Riga. Estrarano de Latva ES 1921—24, 1928—1932, okfoje ĝia prez. UEA-del en Riga de 1922, ĉefdel. de UEA de 1925. Prez. de 1-a Baltlanda E Kongreso, Riga 1930. Latva sekr. de Int. Cseh-Instituto de 1930. Trad. latven ĉefeĉslosilon, 1928. Kompilis la unuan pli ampleksan latvan E vortaron »Ile-

va«, Riga 1932. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Infero. Unua parto de la Komedio de Dante, el la itala trad. Kalocsay. 1933, 288 p., plus 14 lignogravuroj. Ĉefverko de la mondliteraturo. »La koncizo, mirinda esprimforto, vortabundo kaj kolorriĉo de P dantea lingvo, la aparta graveco kaj beleco de ĉiu vorto kaj vortlokiĝo, la ĉiam deviga fideleco vere povas malesperigi la tradukanton... Ne ekzistas aŭtoro pli malfacile tradukebla ol Dante... Kaj E pruviĝis mirinda instrumento.« (El la Antaŭparolo.)

Infinitivo kun prepozicio. Kun infinitivo estas uzataj nur la prepozicioj por, anstataŭ, antaŭ ol, post ol, krom. Ekz: mi venis por vin viziti; laboru anstataŭ malesperi; antaŭ ol skribi, li meditis; li faras nenion krom manĝi. La ago signita de l' infinitivo rilatas ĉiam al la frazsubjekto.

Lastatempe oni pli kaj pli uzas infinitivon ankaŭ post sen; ekz: li foriris sen saluti min. Laŭ la klasika lingvo anstataŭ ĉi tio oni devas uzi participadverbon kun ne: li foriris ne salutante min. KALOCSAY.

Informoj de E-Asocio de Estonio. Organo de EAE, fond. en 1922. Redaktis H. Sakaria kaj P. Ariste, H. Dresen, M. Grigorjev, J. Törn. Formato 28x20 cm.

Informservoj, v. Delegito de UEA.

Inglada Ors. Vicente, hispano, staba vickolonelo, prof. de astronomio, geodezio kaj meteorologio en la Supera Staba Lernejo. Nask. en 1879 en Alicante. De 1910 ĝis 1923 dir. de sismologia observatorio en Toledo. Membro de la Akademioj de Sciencoj de Madrid, Córdoba kaj Barcelona. Multaj fakaj verkoj. E-isto de 1899. En 1903 li fondis (kun Jimenez Loira) la unuan HE gazeton, La Suno Hispana, kies ĉefred. li estis multajn jarojn. En tiu epoko li publikigis kelkajn gravajn lernolibrojn kaj vortarojn. Kiel delegito de la registaro ĉeestis la Teknikan Konferencon en Paris, 1925 kaj la UK en Genève, 1925. Faris multajn paroladojn kaj kursojn en Barcelona, Alicante, Valencia, Madrid, ktp. Honora prez. de multaj EG en H-ujo, estis vicprez. de la H Societo por Prop. de E. LK

de 1905 kaj Akademiano de 1910. En la literaturaj konkursoj organizitaj de »La Revuo« en 1906 kaj 1909 estis premiitaj liaj originalaj poemoj. Kunlaboris en La Revuo, LI, ktp. En la unua kaj aparte li publikigis multajn verkojn en E, i. a. tradukojn el la H: la komediojn Kuracisto per batoj el Moratin; Lanesia hejmo; Kruela adiaŭo; La gefavoratoj; Triumfanta animo; La Angora katino; Perlaborisian vivon; Hispanaj dramoj; La kreitaj profitoj, el Jacinto Benavente, kaj la originalajn verkojn: Prozo kaj versoj; En la Barcelona Kongreso, ktp.

Inicado Matematika. De Laisant, el la franca trad. Chaineau kaj Camescasse. 1914, 171 p., 103 figuroj. Elpensajo, kiu celas amuzila infanaron ĝin instruante.

Inoue Masuzo, japano, oficisto de turisma fako de fervoja ministrejo. Nask. 2 jan. 1900 en Tokyo-si. Kun Hasegawa laboris por E en Unua Nacia Kolegio, Tokyo. Dank' al lia klopodo la ministerio eldonis gvidlibron detalan kaj riĉe ilustritan Japanlando. 1931 vojaĝis al Ameriko, ĉeestis la UK en Paris.

Insigno. La insigno de la E-istoj estas verda kvinpinta stelo. La verda koloro simbolas la esperon kaj la kvin pintoj — la kvin mondpartojn.

Por ĝin formi estas plej rekomendinde desegni rektan (regulan) kvinangulon (sekve ĉiu angulo havos 108°) poste daŭrigi ĉiun lateron ambaŭflanke ĝis la renkonto kun la daŭrigo de du ceteraj lateroj (ne najbaraj). La ricevita tiamaniere pentagramo estos la efektiva insigno. Se ni nun tiun stelon pentros je verda koloro ĝi estos la efektiva E-a stelo. Kun la fluo de la tempo la stelo havis diversajn modifojn, la plej ofta kaj laste preskaŭ oficiala estas tiu: ĉiu kvinono de la stelo estas duone verda kaj duone pli hela (plej ofte blanka), tiel ke la stelo konsistas el kvin trianguloj pli helaj kaj kvin trianguloj pli malhelaj. (alterne ĉirkaŭ unu komuna punkto)

Ankaŭ rimarkigis steloj E-aj, esprimantaj iun fakan aldon-ideon, kiel ekz. kristanoj portas insignon kun kruczo interne, UEAanoj portas kun la literoj

UEA interne, SATanoj — kun literoj SAT, socialistoj — kun ruĝaj kvin ĉirkaŭkampoj anstataŭ la kutimaj blankaj — ĉar por pli videbligi la verdan stelon, kiu ofte sur la fundo de malhela vestajo ne distingiĝadis, oni fabrikadis la stelojn kun aldonado de blanka fono, kaj la tuta insigno havis tiam formon ĉu de rondo ĉu de pentagono (kvinangulo). Multaj aliaj »ideoj« estas esprimataj en la diversaj insignoj. Ekz. estas insigno kun la portreto de Z meze, kun kamentuboj apude, kun olivbranĉoj sube, kun radioj ĉirkaŭe ktp. Ne elkalkuleblaj estas ĉiuj variaĵoj. Dum la UK-oj ofte jetas sin en la okulojn insignoj kun malsupren plilonigita hirundvosto diverskolora. La koloroj evidentigas la naciecon, al kiu apartenas la portanto de ĉi insigno. Ankaŭ — laste ofta aperaĵo — oni rimarkas insignojn en formo de du kruciĝantaj flagetoj, el kiu unu estas la E-a kaj la dua — la nacia.

Apartan belan kategorion formas la kongresaj insignoj. Tiuj de la naciaj kongresoj estas plejparte kartonaj (kvankam pli ol ofte — tre artaj. Sed tiuj de la UK-j estas plejparte metalaj (escepte tiuj de Hago (1920), Praha (1921) dum kiuj la kongresanoj portis kartonajn rondajn insignojn, kaj en Genevo (1925), dum kiu kiel insigno servis silka flag-forma rubandeto kun steleto malsupre). La insignoj de la UK-j prezentas jam ion, pretendantan je arta valoro. Rimarkiĝas kvazaŭ certa konkurado, kaj tial kiel efiko estas tio, ke ni rajtas fieri pri kelkaj perfektaj artaĵoj. La plej bela — mia opinio — ĝis nun estis tiu de la jubilea Kongreso en 1912 en Krakovo kaj tuj post ĝi — tiu de la XI-a UK en San Francisko en 1915. Ankaŭ senriproĉa estas tiu de Parizo (1914), de Antverpeno (1928) kaj aliaj.

Pri insignoj dum la unuaj du UK-j mi ne aŭdis. Cetero tiam ankoraŭ preskaŭ ne ekzistis E-a insigno. Kaj se ĉi tiu portis, do estis ĝuste la primitiva stelo kvinpinta. (Tiujn informojn donis al mi A. B. Brzostowski kiu eĉ montris al mi la steletojn, kiujn — laŭ lia aserto — portis Z mem (dum la unuaj du UK-j).

(Historio.) La E-a insigno en sia historio havas kelkajn periodojn: 1)

kiam la signo estis nur sur papero (t. e. sur presajoj, leterpapero ktp.) Ni trovas en malnovaj n-roj de »E-isto« de 1892 kelkfojajn proponojn kaj eĉ faktojn, ke jam ekzistas multaj E-istoj kun vizitkartoj aŭ kovertoj kun surpreso: E-isto, aŭ E, 2) kiam estis proponita ke ĉiu E-isto portu ian signon (sur la p: 181 de E-isto 1892 ni legas: »B. G. Jonson el Östersund proponas ke la E-istoj akceptu ian difinitan signon, per kiu ili povus, renkontante sin, ekkoni unu la alian, ekzemple koloran silkan peceton, portatan sur la surtuta kolumo. Ni prezentas tiun ĉi opinion al niaj legantoj, kvankam ni dubas, ĉu io simila sur la vestoj estus akceptebla. Sed eble tiu ĉi ideo estus uzinda en alia maniero?«) Tio estis la unua tiudirekta ideo, jetita al la E-a mondo, 3) kiam estis proponita definitive la nuna stelo.

Foliumante la paĝojn de la malnovaj E-aj gazetoj ni trovas multajn aliajn sufiĉe interesajn proponojn, ekz. »brelokon (E-isto de 1893 p: 21) por atantan sur la ĉeneto de la poŝa horloĝo, aŭ apud la... nazumo (pinco-nez).«

Sur la p: 47 de la samjara E-isto ni trovas jam ion rilatantan la E-an stelon, tian, kiam ni konas nun. Nome la alineo 7 publikigas: »L. de Beufmont konsilas, ke la kovriloj de ĉiuj libroj de nia literaturo kaj entute ĉio, kio tuŝas nian aferon, havu verdan koloron kaj portu supre stelon. En tia maniero la verda koloro kun stelo (du simboloj de espero, esperanto) fariĝos la konstanta ekstera signo de nia afero kaj oni ĉiam tuj rekonos ĉion, kio apartenas al ĝi. Ni plene aprobas tiun ĉi ideon, kaj ni ĝin uzados de nun sur ĉiuj verkoj, kiujn ni eldonados. Ni proponas tion saman ankaŭ al niaj aliaj amikoj eldonantoj.«

Tiu ĉi informo jam prezentas klare kiu estas la aŭtoro de la stelo E-a. Kvankam nenio estas dirita pri la formo de la stelo, tamen, ĉar ekde tiu tempo komencis aperadi la kvinpinta stelo sur la libroj de la »Biblioteko de la L. I. E — kvankam alie ombrigita ol la nuna E-a stelo — ni supozu, ke temas en la artikolo de Beaufmont pri kvinpinta stelo.

Sur la p: 84 de la samjara gazeto ni trovas jam informon pli klaran. Te-

mas jam pri insigno (ne nur pri signo presata, sed pri insigno portebla sur la vesto — pri kio ankoraŭ antaŭ kelkaj monatoj la redakcio dubis) Ĉiuj niaj korespondantoj — skribas la redakcio — konsentas, ke tio ĉi estas la plej konvena signo por ni, kaj proponas diversajn detalojn por tiu ĉi signo. S-ro G. Rjabinin proponas, ke la signo prezentu malgrandan rondeton kun diametro de 2—3 centimetroj kun malgranda stelo en la mezo el tia metalo, kiun ĉiu volas; la stelo devas esti sur verda fundamento; la manieron kaj lokon de portado ĉiu povas ekti mem. S-ro P. Deullin proponas, ke oni akceptu simplan verdan stelon, el kiu ajn ŝtofo, laŭ la deziro de la uzanto, kaj sur kiu ajn loko, kun la surskribo: »Ligo E-ista«, aŭ »E-isto«. Ĉar preskaŭ ĉiuj aprobas la verdan koloron kaj stelon kaj jam longe multaj amikoj uzas en sia stampo la esprimon »E-isto«, tial ni pensas, ke la difinita signo de nia afero iom post iom fariĝos: verda koloro, stelo kaj la vorto »E« aŭ »E-isto«. La detalojn, kiel ligi inter si la tri diritajn punktojn kaj en kia formo kaj loko ilin uzi, ni devas lasi al la bontrovo de ĉiu aparte, kaj ni esperas, ke ankaŭ en tio ĉi la tempo kaj uzo baldaŭ ellaboros ion difinitan.

Tamen »la tempo kaj uzo« ne baldaŭ ellaboris ion difinitan. Jen pasis 6 monatoj kaj sur la pĝ. 164 de la samjara gazeto ni legas jam ion, kio pravas, ke malgraŭ ke la stelo jam ekzistis, la verda koloro ankaŭ, tamen la stelo mem ne estis verda. »... Mi pensas, ke estus bone kaj utile, se ĉiuj E-istoj en sia korespondado kiom eble pli multe uzadus **kovertojn** kun nia signo (verda koloro kaj ora stelo) kaj kun...« La aŭtoro de tiuj vortoj estas Arnold Thörn el Böda

Ankaŭ ni legas en 1894 sur la p: 147 de la sama gazeto: »Kvankam la ideo pri ekstera signo por la E-istoj ŝajnas al ni nefacile plenumebla, ni tamen ne volas malhelpi al la disvolvigo de tiu ĉi ideo. Tial ni ankaŭ presas nun la sekvantan leteron, kiun ni ricevis de s-ino A. Prohoroviĉ: »En Nro 12 de E-isto 1892 kaj en Nro 6 1893 S-roj B. Jonson kaj G. Rjabinin proponis ke ĉiuj E-istoj portu egalan

signon; mi jam longe pensis pri tio ĉi kaj ŝajnas al mi, ke tio ĉi estas tre bona rimedo por disvastigado de nia afero. Mi proponas ke ĉiuj E-istoj portu malgrandan kvinpintan stelon el origita bronzo aŭ aluminio kun la surskribo »Esperanto«... Se $\frac{2}{3}$ de ĉiuj E-istoj deziras porti tian stelon, tiam mi aĉetos kaj dissendos ilin al ĉiuj dezirantoj. Tia stelo ($2\frac{1}{2}$ centimetroj en diametro) el origita bronzo kostos 1 rublon, el pura oro — 8 rublojn...

En 1895 la sama gazeto sur la p: 75 publikigas: »La Odesa Rondeto E-ista pretigis verdajn kovertojn (de kelkaj specoj pli karajn kaj pli malkarajn) kun presita surskribo: Lingvo Internacia Esperanto kaj kun ora stelo Esperanta... V. Gernet Odesa Koblevskaĵa 4«.

Tiuj ĉi informoj igas nin pensi ke la prototipo de la nuna insigno estis ora stelo sur verda kampo. Kiamaniere okazis la transiro de la ora stelo al la verda, pri tio ni ĝis nun ne scias. Kiel ni sube konvinkigos, ankaŭ Z ne sciis.

En la raporto de la Unua E Konferenco en Calais — Dover 1904, sekve post naŭ jaroj, ni legas ke s-ro Pourcine proponas enkondukon de unu koma signo E-ista.

Povas esti ke estis ĝuste li, kiu proponis la verdan stelon, dum ĉiuj aliaj ĝisnunaj koncernas alikoloran (La Nurnbergaj eldonaĵoj portis la stelojn de la sama koloro kiel la presajoj, t. e. de la nigra koloro).

Nenie ni trovas ian ajn mencion pri oficialigo de la E-a insigno. Ke plej certe tia oficialigo neniam okazis pravas ankaŭ la jena letero de Z (The British E-ist 1912 p: 34): »Pri la deveno de nia verda stelo mi nun jam ne memoras bone. Ŝajnas al mi, ke pri la verda koloro iam atentigis min s-ro Geoghegan kaj de tiu tempo mi komencis eldonadi miajn verkojn kun verda kovrilo (la atentigo estis tute senintenca). Pri unu broŝuro, kiun mi tute hazarde eldonis kun verda kovrilo, li rimarkigis al mi, ke tio estas la koloro de lia hejmo, Irlando; tiam venis al mi en la kapon, ke ni povas ja rigardi tiun koloron kiel simbolon de Espero. Pri la kvinpinta stelo, ŝajnas al mi, ke unue ĝin presigis sur sia gramatiko s-ro de Beaufort. Tio

plaĉis al mi kaj mi prenis tion kiel signon. Poste per asociado de la ideoj aperis stelo kun verda koloro».

Car tiu enunciado aperis nur en 1912, ni ne miru kial ankaŭ Z ne memoris klare kaj pri ĉio skribas aŭ: »ŝajnas al mi« aŭ tute senpersono: »aperis stelo...«

Kiel ion tute oficialan ni devas tamen konsideri la jenan fakton. Sur la p: 24 de la Kajero Unua (aŭg. 1906) de la E-ista Dokumentaro, t. e. en la oficialaj dokumentoj pri la UK 1905 ni legas inter la decidoj: »... 1, oni akceptas kiel universalan E-an flagon, la flagon de la Boulogne-a Grupo (verda tuko) longa je 1. 20 metro, kun maldekstra supra angulo blanka (0,50×0,50) kaj sur tiu ĉi blankaĵo, verda stelo.«

Konklude ni devas rekoni: la unua, kiu jetis la ideon pri int. komuna signo E-ista, estis B. G. Jonson el Östersund en 1892; la unua, kiu jetis la ideon pri verda koloro kaj pri stelo estis L. de Beaufront en 1893. Kiu prezentis la unua la verdan stelon, tian, kia ĝi estas nun — je tiu demando ni restos plej certe sen respondo.

E. WIESENFELD.

Institutoj. En multaj landoj troviĝas nuntempe nacia instituto de E. Ĝia celo estas ĉefe t. n. »diploma«, t. e. aranĝadi ekzamenojn kaj eldonadi diplomojn ĉiukategoriajn. En multaj landoj la Inst. plenumas la taskon de propaganda (aŭ eĉ nacia) societo. Sed plejparte ilia tasko limiĝas je la supre cititaj celoj, eventuale kun aldono de instruado de E.

Principe ekzistas tri kategorioj de diplomoj: 1) Pri kono de la lingvo, 2) pri kapableco (instrui) kaj 3) profesora. Ĉiu Inst. havas apartan programon kun fiksitaj taskoj solvotaj por sukcesi la koncernan ekzamenon. (depende de la bezonoj kaj cirkonstancoj en la resp. lando.)

La Naciaj Institutoj de E estas sekvo de la antaŭa, t. e. unua formo: Internacia Inst. de E. Komence nur tiu sola rajtis eldonadi diplomojn (precipe profesorajn). Pri ĝia deveno ni ekscias el la protokolaro de la UK 1908. Dum la dua labor-kunsido »S-ro Gaston Moch prezentas proponon pri Internacia Ates-

to pri Kapableco. S-ro E. Privat (Sviso) opinias, ke tio estas afero, ne oficiala, sed de privata organizo, kiel ekzemple de la Int. Instituto de E ĵus fondita en Ameriko.« Poste, en la dokumentoj de tiu UK ni trovas inter la Decidaro, sub n-ro 8: »La Kongreso aprobas principe la fondon de Int. Instituto de E por int. servado de instruado kaj organizo de normalaj lernejoj kaj diplomoj.«

Tiel do ni devas konsideri la fondon de la Inst. de E dum 1908 en Nov-Jorko. Ĝia agado, sub la prezido de E. Privat estis tre vigla, kaj portis karakteron vere internacian. Dum UK-j ĝi organizadis ekzamenojn kaj eldonadis tre belajn diplomojn.

Kun la fluo de l' tempo, kaŭzate de diversaj lokaj bezonoj, malfermiĝadis naciaj Inst. de E. Dum la UK 1924 okazis konferenco de ĉiuj naciaj inst. (prezidis la tiama Direktoro de la Int. Inst. de E prof. Dietterle, sekretario de la gvidanto de Pola Inst. Edvardo Wiesenfeld). Dum tiu konferenco estis akceptataj la du bazaj rezolucioj: 1) La naciaj Inst. de E estas filioj de la Internacia, 2) La Int. Inst. de E havas la taskon enregistri ĉiujn profesoraĵajn diplomojn, eldonatajn de la naciaj inst. kaj validigi tiujn diplomojn sur la internacia forumo (kiel ankaŭ pledi, ke diplomo eldonita de unu nacia Inst. estu rekonita en alia lando).

Car ne ĉie la Institutoj staris sur egala nivelo kaj ne ĉie estas egale taksataj — ekz. en Germanujo la Inst. estis ŝtata kaj ĝia diplomo havis altlernejan valoron — ĝis nun tiu Viena decido ne estas efektivigita. Ĉiuj Inst. do funkcias aparte kaj senrilate kun la aliaj. La Int. Inst. mem nuntempe ne funkcias. E. WIESENFELD.

Instruistoj. Jam en 1910 kunligiĝis 347 E-instruistoj diverslandaj en Int. Asocio de Instruistoj (IAI) kaj eldonis fakan organon Int. Pedagogia Revuo (IPR). Kasisto kaj redaktoro estis Th. Čejka, instruisto en Bystrice-Hostyn. (Ĉeĥosl.) La revuo estis bona, sed la redaktoro plendis pri malkontentiga kunlaboro, pri indiferenteco de la kolegoj.

En la jaroj post la mondmilito forta volo al internacia interkompreno re-

naskiĝis inter la instruistaro. Francaj kolegoj, instigitaj de flamaj krioj de Anatole France, Romain Rolland por la tuthomara solidareco, komencis rekonstrui la int. interrilaton de la E-instruistoj. Marcel Boubou, Orleans, eldonis por kaj per tiu interligo en 1922 edukfakan revuon *Novaj Tempoj*, kies ĉefa karakterizaĵo estis la traktado de la edukaj problemoj kaj de la instruistaj laboroj en iliaj dependeco de la ekonomiaj kaj politikaj faktoroj, kaj kies devizo estis: amo al paco, fido al la progreso. Pro la socipolitika konsidero de la edukscienco, la revuo havis karakteron de serioza, akra batalilo sur atentinda nivelo.

Dum la UK 1924 en Wien 200 E-instruistoj fondis la *Tutmondan Asocion de Geinstruistoj Esperantistaj* (TAGE) kun la celo: kolekti ĉiujn E-instruistojn por propagandi efike la enkondukon de E en lernejo kaj instruistaro kaj eldoni pedagogian fakan revuon (*Novaj Tempoj*). Kiel plej forta unuigo la Saksa Asocio de E-Instruistoj ricevis la komision kaj la respondecon por la eldono de la gazeto kaj la administrado de TAGE.

Prezidantoj de TAGE estis M. Boubou, Orleans (ĝis 1926), Albin Neuzil, Olomouc-Neredin, Ĉeĥosl. (ĝis 1929) kaj Geo. W. Roome, Sheffield, (de 1930).

Depost 1926 la TAGE-organo aperis sub la nomo *Int. Pedagogia Revuo* (IPR). La proks. 150 abonantoj en 1922 kreskis ĝis 883 en 1930 kaj sekve de la ekonomia kaj politika mondkrizo, reiris ĝis 600 en 1932.

La redaktoroj estis Richard Müller, Auerbach (1925), Hans Ludwig, Pirna (1926—1928) d-ro Kurt Riedel, Dresden, (1929—1933). La ĉiam ampleksan kaj ofte malfacilan varblaboron por la gazeto kaj asocio prizorgis la t. n. Laborkomitato, al kiu apartenis la redaktoro, la administranto de IPR, la sekretario de TAGE, la prezidantoj de la germana kaj de la saksa asocioj de E-instruistoj, la direktoro de la germana E-Instituto, la sekretario de »Kunlaborado inter IALA kaj Int. Eduka Oficejo, Geneve kaj la Germana E-Instituto«, la prezidan-

to de la Saksa E-Ligo, kiuj regule kunvenis ĉiumonate en Riesa.

D-ro Riedel donis al IPR scienca bazon kaj reprezentis la principon de la aŭtonomio de la eduksciencoj. IPR enhavis artikolojn pri int. scienca pedagogio, E-a lingvo-scienco, pedagogia terminologio en E, recenzojn de diverslandaj pedagogiaj kaj E-verkoj, raportojn pri kongresoj kaj laboroj de int. instruistaj asocioj pri lernejo kaj instruistaro en diversaj landoj kaj pri E en tiuj medioj. Valora aldono al IPR estis la korespond- kaj interŝanĝdeziroj de infanoj, klasoj kaj instruistoj, aranĝita de la korespond-oficejo de »Kunlaborado«. Dum ses jaroj IPR ekspedis ankaŭ la E-lingvan resumfoliojn de *Vojo de klerigo*, granda pedagogia revuo en Ukrainio. En 1925 aperis la *Jarlibro de TAGE*, enhavanta pli ol 2000 adresojn de E-instruistoj.

Vigla interrilatoj kun la int. instruistaj kaj edukaj asocioj kun Int. Eduka Oficejo kaj IALA, celis la praktikan aplikon de E ĉe la plenumo de la int. laboroj: korespondaj, gazetaj kaj kongresaj. Plej grandan sukceson TAGE havis en la sindikato »Int. Profesia Sekretariejo de Instruistoj« (Strasbourg), kiu mem surpris la propagandon por E kaj dum sia kongreso 1931 en Hamburg aranĝis oficialan E-vesperon, dum kiu famkonataj membroj de IPSI et diversaj landoj pledis por E.

Konsiderindan influon en ĉi tiuj laboroj por TAGE havis dum multaj jaroj ĝia sekretario M. Goldberg, Oetzsch. b. Leipzig.

Pro la specialaj, memstaraj taskoj kaj pro la diversorganiziteco de ĝia membraro TAGE restis sendependa, rilate al UEA kaj SAT. TAGE ankoraŭ ne sukcesis, konvinki la diverslandajn E-instruistojn pri la neceso de kreo de fortaj landaj instruistaj asocioj, sekcioj de TAGE. La plej forta sekcio estis ĝis 1933 la germana, kun proks. 500 membroj, kiu nun verŝajne havigos al TAGE grandajn perdojn. La tre forta »sveda asocio ankoraŭ ne povis korporacie aliĝi al TAGE pro financaj malfacilaĵoj.

Pro la malfacilaj cirkonstancoj, regantaj en Germanujo dum la komenco.

de 1933, la germanaj funkciantoj deziris ekŝigi. La agento por Nederlando, P. Korte, Veendam, estis petata, starigi en Nederlando novan Laborkomitaton. Dum la faka kunveno en la UK en Köln 1933 la novaj funkciantoj estis elektataj: E. Boltjes, Wünschoten, redaktoro; P. Korte, Veendam, administranto-kasisto kaj W. Mook, Groningen, sekretario de TA-GE. La malfacilaĵoj, kiuj amasiĝas antaŭ ili, estas sufiĉe gravaj.

Laŭ informoj de M. GOLDBERG.

Instrumetodoj. La plej malnova, la pure gramatika, estas entenata en la *Fundamento de E* (v.), kiu konsistas el 3 partoj, prezentas en la unua parto fundamentajn 16 regulojn de la E gramatiko. Kompreneble neniu alia lingvo estas lernebla (tiom malpli sen instruisto) el tiel malabunda materialo. En E tio estas tamen tute farebla, pro ties facileco. La unuaj E-istoj, t. e. la lernintoj de la 19-a jarcento ne posedis alian instruilon. Malgraŭ tio ili sukcese studis el la 16 reguloj de Z kaj el la *Ekzercaro*, la dua parto de la *Fundamento*.

Metode la *Ekzercaro* estas aranĝita laŭ la ne plu uzata maniero de tradukado de unuopaj frazoj neinterligitaj esence, el E en nacian lingvon; tiu instrumaniero regis ĝenerale en la pasinta jarcento en fremdlingva didaktiko (Ahn, Ollendorf k. a.).

Ne alian metodon sekvis la lernolibro de *Cart*, kiu antaŭ la milito 1914 disvastiĝis en la tuta mondo en diverslingvaj tradukoj kaj prilaborajoj, kure kun la lernolibro de *Borel*. Ambaŭ estas destinitaj ne nur por kursoj, sed — antaŭ ĉio — por meminstruantoj, dank' al aldonita »ŝlosilo«, t. e. solvaro de ekzercoj kaj de traduktaskoj, per kiu la lernanto mem kontro'as siajn el-laborajojn.

Post la milito aperis en E taŭgaj lernolibroj aranĝitaj laŭ la nova metodo, karakterizata per iom pli interesa enhavo: mallongaj raportoj kaj artikoloj anstataŭ nudaj frazoj, por instigi la lernanton, kun indikoj al paroligo de la lernanto helpe de la instruisto aŭ eĉ sen instruisto tiom kiom estas eble. Samtempe aperis kelkaj bildolibroj por instruado de E, ekz. *Orell Füssli*,

Thora Goldschmidt k. a. kun la sama celo — paroligi.

La plej bona parolmetodo, tiu de *Berlitz*, ne trovis eniron en E-ujon. Almenaŭ ne la *Berlitz*-libro mem. Tiu ĉi metodo postulas ne malpli ol 50 lecionhorojn kaj tiel longan lernadaŭron kontraŭstaras la postuloj de la E-propagando: vantiĝus la aserto pri facileco de E. Kaj estas fakto, ke facila lingvo, kia estas E, ne nepre bezonas la egan faciligon, kian prezentas al la lernanto la *Berlitz*-metodo. Multe pli rapide kaj senpene E estas akirebla helpe de la naciaj gramatikaj antaŭkonoj ol per kutimigo de orelo kaj okulo al la tre libera E-frazkonstruo. Krome, la *Berlitz*-metodo multe dankas sian disvastiĝon tra la mondo al la fakto, ke laŭ ĝi instruas fremdan lingvon koncerna nacio, ekz. franca instruisto donas francajn lecionojn en Ĉeĥoslovakujo: korekta franclingva prononado jen granda avantaĝo dankata ne tiom al la metodo, kiom al ĝia denaske franca plenumanto.

Similan rolon ekplenumis lastatempe la *Cseh-metodo* (v.), kies adeptoj kun la majstro mem, same kiel tiuj de *Berlitz*, instruas E-n al alilingvanoj ekster siaj patrujoj.

La ĉefa karakterizilo de la *Cseh*-metodo estas — alie ol la *Berlitz* — senumo de lernolibroj. La ideo de pastro *Cseh* estas interesi la lernanton des pli multe, ju malpli ĝi scias pri la enhavo de la sekvonta leciono. Tiel ĉiu leciono aperas al la lernanto kvazaŭ atendoplena surprizo. Dank' al tio la *Cseh*-kursoj montriĝis treege sukcesaj kaj en la nuna tempo la plej multaj kursoj de E estas gvidataj laŭ tiu metodo.

Malavantaĝo de la *Cseh*-metodo estas ĝia longedaŭreco (40 lecionhoroj), neproporcio al la lingva materialo, kiu povas esti donata same aŭ eĉ pli abunde en multe malpli longa tempo, precipe al gramatike instruitaj personoj. Tamen, post oficialigo de E 40 horoj aŭ eĉ pli, ne estos grava temporabo por bezonantoj. Grava montriĝis la ebleco per tiaj int. kursoj unueciigi la elparoladon de E tra la mondo.

Interesan metodon de instruado de E liveris ankaŭ *E. Privat* per sia

Kursa Lernolibro, instruilo por komencantoj nur en Esperanta verkita. Ankaŭ tiu metodo konsistas el ĉ. 50 lecionoj. Ĝi estis multe uzata kaj taŭgas por paroligi.

Miksitan metodon, kiu trovas sian lokon inter la gramatika kaj la senpera, prezentas preskaŭ ĉiuj gravaj lastdataj naciaj kaj int. lernolibroj de Esperanto: la materialo estas kutime dispartigita en 10—20 lecionoj, kiuj liveras en interesa maniero temon por preparoj (demandoj kaj respondoj) kaj koncizajn instruojn pri gramatiko (Aymonier, Butler, Möbsz k. a.).

Estas menciinde, ke Esperanto estas instruita ankaŭ en maniero de korespondo (precipe en Nederlando kaj Svedujo), per radio kaj per gramofonaj diskoj (Linguaphone.) Kompreneble ĉiu el tiuj havas apartan metodon depende de la eksteraj kondiĉoj, en kiuj okazas la instruado.

L. DREHER.

Insulo »Esperanto«. La komunumo en la apudnuba bulgara urbeto Rahovo cedis al la loka EG insulon (proks. 180 hektaroj) en la Danubo, por kulturi ĝin kaj aranĝi sablobordan banejon. La insulo ricevis la nomon E.

A. D. ATANASOV.

Insulo de Felĉuloj. De Strindberg, el la sveda trad. O. Frode. 1926, 69 p. »Rakonto fantazia, sed trege pesimisma; ĝia konkludo estas, ke ĉio en nia civilizo estas trompo, perfido, sukceso de plej lertaj hipokrituloj.« (G. S., E' 1926, p: 209.)

Inter Blinduloj. Konsilio por uzado de ĵus blindiĝintoj. Verkita de E. Javal, el la franca trad. s-in-o J. Javal. 1907, XIV kaj 130 p.

Interelementa rilato. Tiel nomas Wüster la grupigon de la elementoj en vorto kunmetita el pli ol du elementoj. Ekzemple en aŭtoaerbremsado la grupigo estas aŭto/aerbremsado, do 1 (2, 3), dum en vaporŝipasocio ĝi estas vapor-ŝip/asocio, do (1, 2) 3. Same: facilanimaeco grupiĝas facil-anim/eco, dum la grupigo en korboneco estas kor/bon-eco. Ĉar en Esperanto la finaj povas esti memstaraj vortoj, ankaŭ ili povas grupiĝi diversmaniere, rilatante jen senpere al la lasta elemento antaŭ

ili, jen al du elementoj kune. Ekz. en voĉdono la finajo rilatas al la elemento don, do la grupigo estas voĉ/don-o (dono de voĉo); male en bonfarto ĝi rilatas al ambaŭ elementoj kune, do la vorto grupiĝas bon-fart/o: bone farti/o: stato bone farti; facilanima grupiĝas facil-anim/a: facila animo/a: karakterizita per facila animo. Ni havas do la analogajn triojn:

aŭto/aer-bremsado	vapor-ŝip/asocio
kor/bon-eco	facil-anim/eco
voĉ/don-o	bon-fart/o

La interelementa rilato plejofte doniĝas per si mem. Se ĉi tio ne okazas, la vorto estas duba, tiam oni devas helpi per la konservo de finajo, aŭ per la elekto de alia elemento. Ekz. ĉe la vorto rapidmezurilo oni ne scias, ĉu temas pri rapid/mezur-ilo (ilo mezuri rapide), aŭ pri rapid/mezur-ilo (mezurilo de rapido). Oni do devas diri subitmezurilo, tujmmezurilo por la unua kaj rapido mezurilo por la dua.

v. Vortfarado; Vortkunmeto

KALOCSAY.

Interlingua. Projekto de int. lingvo de prof. G. Peano, 1909. La aŭtoro celis krei lingvon el la vortarmaterialo de la latina lingvo, laŭeble tute forigante la gramatikon kaj anstataŭ ĝi starigante fiksan vortordon en la propozicio. Tiun taskon li solvis kontentige; kaj por ĉiuj eŭropanoj, konantaj la latinan lingvon, la tekstoj en Interlingua estas facile kompreneblaj. Sed samtempe tre malfacile estas ellerni korekte skribi, kaj despli — paroli la lingvon, kiu ne havas gramatikon kaj kiu tial plej vastgrade utiligas la kason fleksian sistemon de vortoderivado de eŭropaj lingvoj. La lasta cirkonstanco postulas, ke estu ellernataj ne nur la vortoj-radikoj, sed ankaŭ ĉiuj iliaj derivaĵoj. Simila lingvosistemo do estas facile akceptebla nur por edukitaj klasikuloj, kaj en realeco nur inter tiuj klasikuloj Interlingua trovis siajn adeptojn. Peano mem en siaj deklaroj sufiĉe klare limigis la taskon de sia sistemo, kiel lingvon destinitan por uzado al intelektuloj kaj speciale substrekis, ke li tute ne celis krei lingvon, facilan por vastaj, klasike ne edukitaj amasoj.

Int. Centra Komitato (ICK) de la Esperanto-movado. Sekve de la Kontrakto de Helsinki (v.) Konstanta Re prezentantaro (K. R.) de la Naciaj Societoj kaj UEA interkonsentis pri la elekto de Centra E-komitato, kiu konsistis el ses anoj. La nomo de Centra Komitato poste estis ŝanĝata je ICK, kiu fariĝis la gvida instanco de la neŭtrala E-movado, kun sidejo en Genève. ICK organizis kunlabore kun la Lokaj Kongresaj Komitatoj ĉiujn UK-jn de 1924. Unua prez. de ICK estis Edmond Privat, poste ĝis 1933 John Merchant. Anoj en la komencaj jaroj: M. Rollet de l' Isle, d-ro J. Dietterle, Rud. Hromada, W. M. Page kaj s-ino J. Isbrücker, anoj en 1932 M. Rollet de l' Isle, s-ino J. Isbrücker, E. Stettler, d-ro A. Vogt kaj Felix Zamenhof. Gvidanto kaj ĉefa efektiviganto de la ĉiam pli ampleksaj laboroj estis Robert Kreuz, ĝen. sekr., poste dir. de la ICK. Post la interkonsento en Köln (1933) ICK daŭrigas sian agadon en la kadro de UEA. Detalaj raportoj pri la vasta agado de ICK aperis ĉiujare en la Oficiala Dokumentaro. v. Organizo.

Int. Cseh-Instituto de Esperanto, fondita en 1930 en Hago por disvastigo de la Cseh-metodo kaj por eduko de instruistoj laŭ tiu instru-metodo. (v. Cseh-metodo.)

Int. Esperanto-Muzeo en Wien. (IEMW). En 1927 Leono Zamenhof proponis en HDE kreon de Int. E-Muzeo okaze de la jubileo 1937. Pripensante, ke la plej bona loko, laŭ sia situo en meza Eŭropo, povos esti Wien, kies eminentuloj ĉiam estis favorantoj de E. H. Steiner arigis ĉirkaŭ si kelkajn E-istojn por fondo de asocio IEMW, kies prez. kaj funkciulo fariĝis li mem. Baldaŭ troviĝis eminentuloj, kiuj per sia nomo antaŭenpuŝis la aferon. Kiel unua, kanceliero Schöberl, tiam policprez. en Wien, kaj kiel dua, kanceliero Seipel eniris la Int. Honoran Komitaton; sekvis ilin aliaj gravaj personoj.

Sekve de ordono kanceliera estis ricevata granda subtera ejo en iama ministeria palaco en I. Liebiggasse 5. Sed pro neuzebleco de la ejo post irado de unu instanco al la alia IEMW fine ricevis du etetojn en la palaco Anna-

gasse 4. En apr. 1928 H. Steiner kun sia helpanto Gustav Weber eklaboris. Diversaj oficialaj instancoj pruntedonis kelkajn plej necesajn meblojn kaj la unua donaco (500 ŝ. de s-ro Falnbigl) permesis aĉeti la nepre necesajn laborilojn.

Havinte la ideon, ke la altranga instituto: la Nacia Biblioteko (iama kortega), estus la plej inda por la Muzeo, H. Steiner post streĉa agado gajnis por tiu plano la ĝen. direktoron de la N. B., univ. prof. J. Blüch. Poste Steiner veturis al la UK en Antwerpen 1928, kie en kunsido de KR oni decidis, ke la tuta afero estas »privata« afero de s-ro Steiner. Sed la anoj de la 1-a laborkunsido multe aplaudis la raporton de Steiner kaj akceptis ankaŭ la inviton por ĉeesti en 1929 dum Antaŭkongreso la malfermon de IEMW.

La unua kolekto estis la biblioteko de Unua E-Unuigo en Wien (pli ol 700 libroj) donacita al IEMW laŭ propono de E. Sós; sekvis tiu de F. J. Schade kun pli ol 600 libroj kaj diversaj sendaĵetoj. Inter la unuaj donacintoj estis generao Rambousek (Ĉ. Budejovice).

7 sept. 1928 la Loka Kuratora Komitato fiksis kun N. B. la detalojn de kontrakto, laŭ kiu la Societo IEMW transdonas la kolektilan materialon al N. B. kiel proprajn, kaj N. B. starigas la E-kolekton kiel »speciala kolekto« laŭeble en aparta ejo kaj konservas ilin kiel propran havaĵon.

La festaj aranĝoj por la malfermo (okaze de Antaŭkongreso) komenciĝis 30 jul. 1929 en ĉeesto de pli ol 700 aliandaj E-istoj. Akcepto de pli ol 60 delegitoj okazis ĉe la federacia prezidanto Miklas (kiu jam 15 jan. fariĝis protektanto de la Muzeo) en la dancsalonego de la prezidantejo. Je la 10-a horo eniris la prezidanto, lin sekvis la kanceliero Streeruwitz k. a. La prez. donis unue la manon al reg. kons. Steiner kaj diris al li, ke li estas distingita per la titolo »registara konsilisto«. Poste la prezidanto kaj kanceliero diris kelkajn vortojn al ĉiu unuopa E-isto. La aliaj samideanoj atendis antaŭ la prezidantejo kaj ĉiuj kune iris nun al la magistrata domo, kie urba konsilisto Quirin Kokrda salutis la kongresanojn. Fine okazis en la pomsalonego

de N. B. malfermo de la Muzeo. Pli ol 150 honorgastoj ĉeestis, inter ili la prez. Miklas, kanceliero, ministroj, episkopoj, ambasadoroj, ktp. Unue parolis ĝen. dir. Blick, due sekvis la festparolado de Steiner. Poste prez. Miklas parolis en germana lingvo kaj finis per la jena frazo en E: »Dirante al niaj karaj gastoj koran bonvenon en Aŭstrio, mi deklaras la Int. E-Muzeon malfermita.« Sekvis longdaŭra aplaŭdo, ĉar la unuan fojon regnestro uzis oficiale E-n. Unu transdonis diversajn donacojn al IEMW; i. a. Lidja Zamenhot kajeron, manuskribitan de Z el 1881 kun tradukprovo de »Rabistoj« de Schiller ktp. Sekvis alparoloj de reprezentantoj ol 35 landoj. Ekspozicio en la pompa salonego montris dum 2 monatoj al multnombraj vizitantoj en 50 kestoj, sub vitro, parton de la havaĵo de la Muzeo.

En okt. 1929 IEMW ricevis la oficejon en parto de N. B. Augustinerstrasse 7. La 1 jul. 1930 IEMW translokiĝis en la novan hejmon: en Neue BurgsurHeldenplatz« (Nova imperiestra kastelo). La salonego estis finkonstruita por IEMW kaj la kostojn (ĉ. 9000 sv. fr.) pagis la ŝtato, kiu zorgas ankaŭ pri hejtado, lumigado kaj purigado; la bindadon de la libroj pagas N. B.

La 8 jul. 1931 alvenis kiel heredajo post Carties tuta libraro, entute pli ol 1500 libroj (gazetjarkolektoj en 3 kestoj jam alsenditaj en jun. 1930). Nuntempe la stato de la Muzeo estas proks. 6000 libroj kaj broŝuroj, pli ol 1000 gazetjarkolektoj, miloj da cirkuleroj, fotoj, ktp. Inter la libroj estas valoraj, sed mankas ankoraŭ multaj. Proks. 50 nacioj jam estas reprezentataj en la membraro de IEMW.

La Muzeo estas vizitebla labortage inter 9—12 kaj 15—18, sabate 9—12, kaj la unuan dimanĉon de la monato 9—12 h. Eniro senpaga. H. STEINER.

Int. Esperanto-Servo. Informa aŭt. bulteno de la ICK (Genève) en la ĉefaj eŭropaj lingvoj, sendita al multaj int. kaj landaj instancoj. Red. Kreuz. De 1926. Nuntempe ne aperas.

Int. Floraj Ludoj. Laŭ la modelo de la tradiciaj literaturaj konkursoj en Katalunujo, la tieaj E-istoj de 1905 aranĝas Florajn Ludojn por E-istaj

verkistoj. La Ludojn subtenas ankaŭ la urbaj magistratoj kaj oni fiksis diversajn temojn kun premioj. La premiojn disdonas juna virino, nomata »reĝino«, ĉirkaŭata de aliaj belaj virinoj, en kadro de festaj eksteraj. Multaj eminentaj verkistoj de E gajnis premiojn ĉe la Floraj Ludoj. Kelkfoje havis rimarkindan sukceson ankaŭ blindaj E-pojtoj.

Int. Katolika Unuiĝo Esperantista, v. Katolika Movado.

Int. Komerca Revuo. Zürich, red. kaj eld. H. Unger, sept. 1919—aug. 1922, entute 26 kajoroj kun 370 p. da tekstoj kaj multaj reklampaĝoj.

Int. Labor-Oficejo. (ILO). Estis fondita en 1920 en Genève laŭ la packontrakto de Versailles por interkonsentoj en industria leĝaro de diversaj regnoj. Komence ĝi uzis por oficialaj interrilatoj nur la anglan kaj francan lingvojn, sed poste ankaŭ aliajn lingvojn kaj kiam UEA proponis al ĝi la servojn de la delegitoj, ĝi ekaplikis E-n kun sukceso, precipe en la unuaj jaroj, kiam la retaro de la Oficejo ankoraŭ ne pretiĝis en la tuta mondo. ILO eldonis en E diversajn cirkulerojn kaj dokumentojn, instruigis E-n al kelkaj siaj oficistoj, sendis sian oficialan reprezentanton al UK-j, kaj eldonis depost 1921 sian oficialan bultenon, kiu estis aldonita al la gazeto de UEA.

Int. Medic'na Revuo. Dumonata organo de TEKA. Fondita en 1923. Formato 24×16. (v. Medicino.)

Int. Pedagogia Revuo. Organo de TAGE. v. instruistoj.

Int. Sciencia Revuo. Organo de ISAE, fond. en 1904, ĉesis en 1923. Redaktis Fruictier, Saussure, Thawitzer, Döhler, Robin, Rollet de l'Isle, Wüster. »Fondita por sciencistoj tiu gazeto iom post iom pleniĝis je artikoloj de amaroj, lingvaj diskutoj, reformaj polemikoj, fremdaj al scienco.« (BIL, p: 314.) v. Scienco.

Int. Stenografiisto. Organo de IAES, fond. en 1923 de P. Flageul, kiu estis ĝia red. Nuna red. L. Cogen.

Int. Unio E-ista (IUE), organizaĵo kun devizo »Liberu, laboru kaj pacu!« fondita en 1925 en Berlino de P. Hitrov nun loĝanta en Sofio. Celoj: aranĝi interŝanĝon kaj senpagan ĉeestadon en eksterlando; monhelpi komercantajn

profesiulojn; doni stipendiojn al diligentaj lernantoj kaj studentoj; subteni malsanulojn kaj multenombrajn familiojn de malriĉaj amikoj; fondi sendependan int. kolonion kun oficiala lingvo E. De kelkaj jaroj mankas informoj pri la efektiva funkciado de IUE.

Internacia Kantaro. Kolektita kaj prilaborita de Benne mann. Tekstaro: 1929, 112 p. Muzika eldono: 1930, 154 p. Enhavo: Espero, Tagiĝo, polkantoj el 55 landoj. »La kantparoloj estas bone tradukitaj, korekte versigitaj, zorge ritmitaj laŭ la melodioj.« (G. S., 'E', 1930, p. 7.)

Internacia Legolibro. Redaktis Kenn-gott. 1930, 123 p. Originale verkitaj legajoj de Stojan, L. Briggs, Mezei, Balkányi, Kenn-gott, Hetzel, Kreuz kaj J. Bergh.

Internacia lingvo. (Historia skizo ĝis Volapük.) La kresko de la int. rilatoj, multe superintaj la kadroj de koncernaj ritualoj dum la antikvo kaj mezepoko, aktualigis la problemon pri la lingvo universala. Jam ne eblis kontentiĝi per tiu skalo de int. rilatoj, kiuj difinis sisteme int. uzadon por limigitaj lokaj bezonoj de la lingvoj: babilona, antikva greka kaj latina. La malkovro de la Nova Kontinento kaj la grandiozaj perspektivoj de plifortigo kaj plisimpligo de rilatoj kun Hindujo kaj aliaj landoj, kresko de potenco kaj influo de nova socia klaso, la burĝaro, celanta forigi la nacian limiĝitecon de feŭda mezepoko, decida fiasko de la mezepoka int. lingvo, la latina, kiu jam ne kapablis konformiĝi al bezonoj de rapide evoluantaj scienco kaj tekniko, — ĉi ĉiuj faktoroj akcelis starigon de la problemo pri dezirindeco de nova lingvo-ilo por interpopola interkompreniĝo.

Interpopola jargono de Mediteraneaj havenoj dum la mezepoko, — la Lingva Franka — ne povis solvi tiun taskon. Provoj versi novan sangon en la mezepokan latinon, vivigi kaj plikonformigi ĝin al la novaj bezonoj, montriĝis senrezultaj.

Unu el plej grandaj humanistoj de sia tempo, la hispano Vives en sia libro »De Disciplinis« (1532) skribis timoplene: »Estus feliĉo, se ekzistus unusola lingvo, kiun povus uzi ĉiuj

popoloj... Pereos la latina lingvo kaj tiam venos grava konfuzo en ĉiuj sciencoj, grava fremdiĝo inter la homa gento.« La maltaŭgo de la latina lingvo por la aktualaj bezonoj estis tiom klara por la pensuloj de tiu tempo, ke la instruita kuracisto kaj astrologo Nostradamus en 1555 profetis en siaj antaŭdiroj »Centuries« aperon de nova kultura lingvo »inter la popoloj latinaj kaj orientaj.«

Sur tiu bonpreparita tereno de disreviĝo pri la malnovo kaj de atendo de io nova ekaperis multaj provoj solvi la problemon de tutmonda int. lingvo. De la filozofoj Descartes (1629), Leibnitz (1666) kaj de la pedagogo Komensky (1641) dum la 17-a, 18-a, 19-a jarcentoj kaj ĝis la nunaj tagoj kontinue daŭras provoj skizi strukturajn bazojn kaj bazajn formojn de nova monda lingvo.

Ankoraŭ longe antaŭ la tempo, kiam la scienco kapablis plene kompreni la esencon de la »lingvo«, apartaj scienculoj kaj pensuloj komencis ellabori projektojn de pazigrafio (universala ideografia skribo), de gestaj lingvoj, de filozofiaj aprioriaj lingvoj, bazitaj sur sistemo de logika klasifiko, de komunhomaj simboloj lingvoj ktp.

La utopiistoj Thomas More (1516) kaj Denis Vairrasse (1677) skizis bazojn de la estonta lingvo. Ankaŭ Fourier kaj Cabet sin okupis pri tiuj problemoj. La epoko de la granda franca revolucio kaŭzis aperon de speciale konsiderinda nombro de similaj projektoj. Sed la nesufiĉaj konoj rilate al la esenco de la lingvo kaj al la vojoj de ĝia evoluo, la troraciaj konceptoj de la epoko de la franca revolucio, kiuj apartigis la lingvon-ilon for de la socio, for de la formoj kaj kondiĉoj de la ekzistado de tiu socio, reale malebligis la aperigon de praktike efektivegeblaj projektoj pri la int. lingvo. Tamen tiuj provadoj estis necesaj antaŭpreparaj laboroj, eksperimentoj kaj esploroj, sen kiuj ne estus solvo de la problemo.

En la 19-a jarcento la problemo de komuna lingvo interesis ne nur apartajn personojn, sed ankaŭ pli vastajn tavolojn, avide akcelintajn novajn almitojn de scienco. Tio klarigas la akcepton de pluraj sistemoj de diver-

saj int. signaroj, kiel la lumtura signalado (1865) la mara signalaro (1871), la decimala klasifika sistemo por bibliotekoj ktp. Tio klarigas ankaŭ la kvantan kreskon de la projektoj de artefarita lingvo dum la dua duono de la 19-a jarcento, kaj tio klarigas, ke la plimulto de novaj lingvoprojektistoj forlasis la tro abstraktajn bazojn kaj alproksimiĝis al la ekzistantaj »naturaj« lingvoj.

Internacia Mondliteraturo. Kolekto de literaturaj verkoj, tradukitaj el multaj lingvoj. Formato 18×12½ cm. Eldonas F. Hirt und Sohn, Leipzig, submetita al la gvidado de prof. Dietterle. Ĝis nun aperis 21 volumoj.

Internaciismo kaj purismo. »Ni observas en la E-evoluo du tendencojn, samtempe efikantajn. La unua celas lingvo-formojn plej internaciajn, laŭ sia formo. Tiu tendenco enestas jam en la »Unua Lernolibro«, kies 15-a regulo permesas uzadon de ĉiuj vortoj — tiel nomataj »fremdaj« (pliverrdire »internaciaj«). La rezulto de tiu tendenco estas apero de vortoj: redaktoro, redakcio, iŝtiologio (apud la fiŝscienco) ktp. Ni povus nomi la reprezentantojn de tiu tendenco — »E-istoj-internaciistoj«. La dua tendenco celas, ke la lingvoformoj fariĝu laŭeble logikaj, laŭgramatikaj, eĉ se tio kelkfoje kontraŭas al la tendenco internacieca. Jam en la »Unua Lernolibro« ni povas konstati tiun duan tendencon. En la sama regulo 15-a Z skribis: »Ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi sensanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo E«. La rezulto de tiu dua tendenco estas apero de vortoj: redaktisto, redaktejo ktp. La reprezentantoj de tiu dua tendenco estas kvazaŭ »E-aj puristoj« ...

DREZEN, SKIZOJ. p: 77.

Interna ideo. La lingvo en si mem estas nur lingvo, sed ĉu nacia, ĉu internacia, ĝi kaŝas en si certajn sentojn, ideojn, eĉ klopodojn. La nacia lingvo estas amata de la nacio, E estas same amata de siaj adeptoj, speciale de tiuj, kiuj E-n konsideras grava faktoro por torigi la militon el la homa socio. Kiel mem Z diris en sia kongresa parolo (1906): »Al laborado

por E instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo int. en si enhavas. Tiu ĉi ideo — vi ĉiuj sentas ĝin tre bone — estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj. Tiu ĉi ideo akompanadis E-n de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Ĝi instigis la aŭtoron de E, kiam li estis ankoraŭ malgranda infano...« Eble plimulton de la E-istaro en la unuaj jardekoj entuziasmiĝis similaj sentoj kaj ideoj, sed multaj, inter ili Beaufront, Bourlet, opiniis danĝera tiun idearon, kaj postulis, ke oni propagandu E-n nur kiel lingvon praktikan sen ia ideo aldono. La interna ideo neniam estis klare kaj strikte difinita, sed ankaŭ en la religio ne la dogmoj estas la ĉefa afero kaj la interna ideo mem similas multe al la religio. Tamen Z klopodis doni pli firman idean bazon por la E-ismo kaj tiel naskiĝis la parenca idearo, la Homaranismo. (v.)

International Language. Por pli bone propagandi E-n, BEA decidis je la fino de 1923, partigi The British E-isten IL, kiu krom kelkaj ekzercoj estis nur skribita en angla lingvo kaj The British E-ist, kiu aperis nur tre modeste kun plej ofte nur 4 paĝoj kiel oficiala organo de BEA, kaj enhavante nur la oficialajn sciigojn, kronikojn, recenzojn ktp. BIL plej bone karakterizas IL jene: »plej trafa nacilingva propagandilo, kiu prave forlasis malnovajn »verdstelajojn« neniel imponajn por ne-E-istoj. Anstataŭ ŝuti belajn frazojn, kiel faris antaŭmilitaj tipaj E-aj gazetoj, ĝi trankvile raportas pri faktoj, multe pli konvinkigaj.« Ĉefe pro ekonomiaj kaŭzoj en junio 1931 oni denove kunigis la du gazetojn. La antaŭa suplemento al »The British E-ist« (jan. 1922—dec. 1923) La Juna Studento poste La Juna Lernanto fariĝis monata parto de IL sub la surskribo LJL ĝis dec. 1924. De jan.—okt. 1925 tiu lasta parto estis nomata: »For beginners young and old« kaj ankaŭ aparte publikigata sub la titolo LJL; de okt. 1925 ambaŭ estis nomataj The E Student. La paĝnombro de IL de 1924—31 estas: 272, 304, 256, 280, 256, 244, 284, 120—25×19. P. TARNOW

»Oni de la komenco riproĉis al The British E-ist, ke ĝi ne enhavis sufiĉe da materialo a) propaganda, b) oficiala, c) literatura. Oni penis kontentigi ĉiujn, farante The B. E-ist oficiala organo, kaj fondante IL por propagando kaj Literaturo por lit. Sed pro financaj kaŭzoj oni ne povis subteni la du novajn gazetojn kaj IL havigis al BEA grandajn monperdojn, kaj ne altiris la publikon laŭ espero.« (M. C. B.)

Interniario. L. Jenkins en London 7 nov. 1923 fondis la Kolportistan Asocion, kiu celis propagandon de la Biblio, religiaj gazetoj en la tuta mondo. Dum la unua jaro de sia ekzisto la asocio disdonis pli ol 5000 evangeliojn, libretojn ktp. Ĝia organo estis La Kolportisto. La sekvan- to de tiu ĉi asocio estis la Interniario, sub alia nomo, sed kun similaj celoj. Fondinto: Jenkins en 1926. Ĝi volis esti »monda frataro por la vera aplikado de la interna ideo de E«. Laŭ la 1. la interna ideo estas: unu komuna kaj egala frateco inter anoj de ĉiu raso, nacio, klaso kaj religio; la serĉado por la vero sen ia ajn dogmo aŭ ia ajn antaŭjuĝo; la rekonno, ke oni ne povas akiri la veron sen serĉado kaj komparo de la instruoj de aliaj religioj kaj filozofioj; kaj, ke la unua paŝo al la Monda Paco, same kiel al la vero, estas per la reciproka interkomprenado de la tuta homaro. La efektiva agado de ambaŭ societoj estis grandparte disdonado de kristana literaturo, por kiu donacis grandparte unu aŭ du individuoj. I. unue estis tre ampleksa, bonvenigis eĉ Budhistojn, ktp., fine fariĝis pure kristana. La entrepreno, kies gazeto estis La I., nun stagnas aŭ ĉesigis sian agadon.

Laŭ I. SIRJAEV.

Intersteno (= Internacianalstenografio) de Felix von Kunowski, moderna stenografia sistemo. Vere internacia, ĉar aplikebla por ĉiu lingvo. La eltrovinto mem verkis malgrandajn lernilojn por proks. 30 lingvoj; li kaj aliaj ankaŭ pli detalajn lernolibrojn por unuopaj lingvoj (E, germana, angla, franca, hispana, pola, rusa, hebrea, greka, japana.) La fundamento de I. estas tiel simpla, ke ĝin povas lerni infanoj, kiuj ankoraŭ ne scias la komunan (long-) skribon, dum kelkaj se-

majnoj. Jam lernis ĝin tiaj infanoj en diversaj landoj. La ortografio estas pure fonetika, kiel la E-a; la signoj estas simplaj strekoj; ĉiu signo signifas ĉiam la saman sonon. Ankaŭ la metodo de plimallongigado en la debatskribo estas simpla, kaj preskaŭ la sama en ĉiuj lingvoj. Dum la lastaj jaroj Kunowski eltrovis plue preslitterojn por sia sistemo, tiel ke I. nun estas ne nur skribebla, sed ankaŭ presebla per proks. 200—300 tipoj. Presita I. estas pli klare legebla kaj malpli longa ol nuna gazetpresajo. La interstenanoj celas ke I. anstataŭ la nunajn skribajn kaj presajn alfabetojn en ĉiuj lingvoj. Provizore tiu ĉi celo estas malhelpata en multaj landoj per ŝtata protektado de aliaj sistemoj. Por disvastigi siajn ideojn en la diversaj landoj, kaj por interkompreniĝadi, la interstenanoj uzas E-n (la supre nomitaj malgrandaj lerniloj estas verkitaj en E). Gazetoj eliris ĝis nun en Germanujo: du preslittere (unu germana, unu E-a) kaj tri aŭtografitaj (du germanaj, unu multlingva.) Unuopaj plujaj gazetoj aperas en aliaj landoj (Grekujo, Japanujo, ktp.) H. FRIESZ (interstenano).

La gvidideo de I. estas tre simpatia precipe por E-istoj. Sed estas dube, ĉu unusola skrib sistemo povus kontentigi tiel multajn kaj diversajn bezonojn, tiujn de la skribaj kaj presaj alfabetoj, tiujn de la stenografio en la malalta kaj alta gradoj kaj por ĉiuj lingvoj, (kvankam kun modifoj). Tamen, eĉ se I. signos nur ĝustan direkton en la plisimpligo kaj unuecigo de la skribformoj, ĝi havos gravan signifon en la skriba tekniko, malgraŭ tio, ke multaj tradicioj, la tuta librotrezoro kaj ĉiuj presejoj de la mondo ne estas ofereblaj eĉ al la plej perfekta skrib-sistemo.

Io-ujo-bata'o. Tiel oni nomas la akran disputon, kiu ekflagris en E-ujo pri la sufikso -io por landnomoj, iniciatita de H. Hodler, tiama prez. de UEA. La kontraŭpartion gvidis prof. Cart. La batalo estis tre akra, temis pri bojkoto kontraŭ UEA, la LK oficiale malaprobis la sufikson -io, ktp. Fine UEA cedis. Nun, kiam pli ol duono de la E-istaro uzas la sufikson -io, tiu batalo ŝajnas malŝparita heroaĵo. Certe ĝi havis la rezulton, ke la sufikso -io

eĉ nun ne estas ĝenerale uzata, kvankam ĝi nepre estus jam sen la oficiala kontraŭstaro. KALOCSAY.

»Temis ne pri bojkoto, de UEA, sed pri la fakto, ke la gazeto „E” misuzis sian pozicion dum la militaj jaroj enkonduki novan kontraŭfundamentan formon. — La serioza afero ne estis la malgravajo -io anstataŭ -ujo, sed la principo de ŝanĝo en la Fundamento, kiu estas treege grava, kaj absolute ne permesebla. — La uzo de -io fariĝis kvazaŭ politika dialekto en E.« (M. C. B.)

v. Landnomoj.

IPR: Int. Pedagogia Revuo. (v. TAGE.)

IRA: Int. Radio-Asocio. (v. Radio)

Irak. (Mezopotamio) »Dank'al modela subteno de J. A. Massi ni povis kontakti kun konsiderinda nombro da interesitoj kaj novaj samideanoj, precipe en Bagdad.« (ICK-raporto 1931.) »La rilatoj iom malfirmiĝis.« (1933.) UEA-del. en 1933 en Basrah.

Irlando. En la fruaj jaroj de E Irlando donis al la movado kelkajn el la plej spertaj pioniroj: O'Connor kaj Geoghegan. Inter la unuaj E-istoj de la lando estis M. Fournier, A. Mc Cormick kaj J. Douglas. La unua E-Societo estis fondita en 1903 en Dublin. En 1907 estis organizita Irlanda E-ista Asocio, reorganizita en 1925 per Mc Cormick kaj Mortished. Antaŭmilite laboris kontentige la E Sekcio de la Societo de Modernaj Lingvoj en Dublin. Dum la milito kaj la »maltrankvilaj tempoj« la movado ne progresis, sed poste denove oni komencis klasojn. De 1925 ĝis 1930 IEA progresis, aranĝis klasojn, kunvenojn kaj prelegojn, propagandis en ĉiuj randoj kaj eldonis gazeteton *I r l a n d a E - i s t o*. En 1928 Macaulay fondis la Ligon de Katolikaj E-istoj. Dum la lastaj jaroj la movado dormetas, sed estas multaj E-istoj en diversaj randoj, kiuj kunvenas de tempo al tempo. Dum 1932 ne estis oficialaj klasoj. La Katolika Ligo nun propagandas vigle tra la lando kaj aranĝas ekzamenojn.

N o t o. La artikolon tralegis H. Macaulay. F. R. A. Mc CORMICK.

ISAE: Int. Scienca Asocio E-ista. (v. Scienco)

Isbrücker (isbrüker) J. R. G., nederlandano, ing. Nask. 19. julio 1889 en Hago. E-isto de 1909. Estrarano de la haga grupo kaj de LEEN. LK kaj Akademiano. Prez. de la 12-a UK en Hago. Komitatano de UEA. Membro de la ekzamena komitato. Aŭtoro de La evoluo de la telefonio; kaj de Historio kaj organizo de la E-movado, kunaŭtoro de kontraŭ-Ida broŝuro. Tradukis en E Gijsbrecht van Amstel, de Vondel kaj en kunlaboro kun J. C. Isbrücker-Dirksen kaj J. Ziermans Akbar, de P. A. S. van Limburg Brouwer.

Isbrücker (isbrüker) Julia C., nederlandano, edzino de J. R. G. Isbrücker. Nask. 22 sept. 1887 en Rotterdam. E-istino de 1909. Membro de ICK kaj de la ekzamena komitato. Prez. de la grupo en Hago. Gvidis kursojn, faris prelegojn, ankaŭ pri pacifismo. Organizis la int. Interreligian Konferencon en Hago 1928, fondis kun Andreo Ĉe la Int. Ĉe-instituto en 1930. Kuntradukantino de Akbar.

ISE, Internacio de Socialistaj E-istoj. Baldaŭ post kiam laboristaj E-istoj en 1921 per la fondo de SAT kreis propran mondorganizon por proletaj E-istoj, en ties randoj jam estiĝis ia malkontenteco pri la strukturo kaj ideologio de la nova organizo SAT. La kolektivismemaj lab. E-istoj deziris, ke SAT ne baziĝu sur individua membreco, sed sur membreco kolektiva de landaj laboristaj E-unuiĝoj. Per ĉi lasta SAT ne nur kolektus grandegan nombron da lab. E-istoj en siaj vicoj, sed ankaŭ forigus duoblan organiziĝon por unu sama afero, nome laŭlandan kaj int. organiziĝon aparte. Por pli firma apogo de la int. instanco sur landaj organizoj kaj por plidemokratigo de la administracio oni postulis la enkondukon de la delegitsistemo. Sed la gvidantoj en SAT rifuzis tiajn reformpostulojn kaj atingis helpe de la nedemokrata sistemo, ke grandaj amasoj de lab. E-istoj restis sen ia influo al la gvidado de sia mondorganizo. — Krom tiuj kaj aliaj aferoj precipe la nekontentiga solvo de la problemo pri la partidecenaj antagonismoj kaŭzis kreskantan malkontenton en multaj prolet-E-istoj en kaj ekster SAT; kaj

ĉiam pli laŭtigis la voko de tiuj, kiuj deziris aŭ aliformigon de SAT aŭ kreon de alia mondorganiza ideologie ligita kun granda Laborista Internacio. Tiel unue la komunistaj E-istoj forlasis SAT-on kreante IPE-on en 1932. — La socialistaj E-istoj longe hezitis plimalfortigi la Laboristan E-movadon per plua skismigo. Ili multe klopodis atingi iom kontentigan solvon en la kadro de SAT per certaj reformoj. Sed kiam definitive montriĝis, ke la obstino de la SAT-gvidantoj malebligas ĉian kompromison, tiam la malkontentuloj sub la gvido de la forta Aŭstria Laborista Ligo E-ista (ALLE) elpaŝis al fondo de Internacio de Socialistaj E-istoj (ISE). Post kelkajara interligo kaj korespondado, tormiĝis printempe de 1933 Iniciata Komitato, al kiu apartenis anoj el dek landoj kaj kiuj ellaboris statutprojekton kaj la tutan bazon por la fondota Internacio. Kaj dum pentekosto 1933 okazis en Vien la Mezeŭropa Konferenco, kiu unuanime decidis la starigon de ISE.

La fondo de ISE estigis entuziasman eŝon tra diversaj landoj. Aliĝis ĝis 1. XI. 1933 jenaj organizoj kiel sekcioj: Aŭstrujo: ALLE kun 1850 anoj en 53 grupoj. Ĉeĥoslovakujo: ĈLAE kun 210 anoj en 4 distriktoj kaj kelkaj lokaj grupoj. Francujo: ESFIO kun 250 membroj individuaj kaj grupe organizitaj. Finnlando: FLEA kun ĉ. 100 anoj. Hungarujo: HESL kun ĉ. 800 anoj en 37 grupoj. Danzig — Grupo Zoppot kun 15 membroj. Krome ISE havas reprezentantojn kaj izolajn membrojn en Belgujo, Germanujo, Hispanujo, Jugoslavujo, Litovujo, Estonujo, Nederlando, Svedujo, Svisujo kaj Usono. La organo de ISE estas La Socialisto kiu aperas provizore nur ĉiunonate, kvartformate, okpaĝe, tute en E. — La strukturo de ISE estas demokrata, bazita sur delegitsistemo. Ideologie ISE estas parenca al la II. Internacio (Socialista).

(v. Laborista movado.)

H. WEINHENGST, (ISE).

La detruo de la demokratio en Aŭstrio febr. 1934 kaŭzis malfortigon ankaŭ de ISE.

Ishiguro (iŝiguro) Yoshi H., japano, redaktoro. Ĉefdelegito de UEA. Nask.

3 jun. 1898 en Aiti-ken. E-istiĝis 1914 pere de angla lingva korespondado. Eldonis gazetojn: Eklumo, 1925; E en Nipponlando, 1926—28. Lingvo Int., 1929—30; redaktis E Kiboŝa, 1930. 1927 radio-kurso JOCK (Nagoja), unua en J-ujo propra. Kursgvido ĉ. 280 fojojn, parolado ĉ. 420 Mirinde sukcesis eldonigi siajn diversajn elementajn lernolibrojn, ekz. E por komencantoj, 1932, Moderna E-J-vortaro (1933), Esperanto-Korespondo (1932).

Islando. La unua prop-isto estis Th. Thorsteinsson, kiu laboris de 1903 por E en Reykjavik. Aperis de li multaj artikoloj en la lokaj gazetoj kaj li verkis la unuan E lernolibron por islandanoj. 1906 venis el Francujo en la ĉefurbon sub verda E standardo fiŝkaptistaj ŝipoj de Duchochois, kio estis notita en la gazetoj. En 1913 oni prop-is eĉ inter la lernuloj. 25 nov. 1927 en Reykjavik estis fondita E societo, kaj la urbestro senpage disponis lernejon por E kursoj. Laŭ la Dietterlestatistiko en 1928 E-istoj troviĝas en 12 lokoj. UEA-del. en 1933 en 3 lokoj.

ISOSEK. E Instituto, kiu eldonas Int. Superan Skriban E Kurson. Celoj de la kurso i. a.: perfektigi la lingvon kaj stilon de tiuj, kiuj jam lernis E-n; prepari progresintajn lernantojn al ekzameno por instruisto aŭ kursgvidanto; internaciigi la lingvon kaj stilon de la kursanoj pere de diverslandaj korektoj. Centra oficejo: Heerlen, Nederlando, Naciaj oficejoj en diversaj landoj. Direktorino: Tekla Flint. Organo: Nja Informilo, senpage por kursanoj.

ISR: Internacia Socia Revuo. v. Laborista movado.

Israels Ratel, nederlandano, instr. Nask. 29 jul. 1887 en Visvliet. Instruadas E-n en A kaj B kursoj. Fondis en 1929 "blindulan E-organizaĵon Nosome, kies prez. li estas. Age partoprenas la lab. E-movadon kaj la int. blindulan E-movadon.

Itel Ludwig, germano, asekurdirektoro. Mortis 17 dec. 1933 en Wiesbaden. De 1908 ĝis la morto UEA-del. kaj laboris amplekse por E.

Italaj rakontoj. De Amicis, el la itala trad. Monti. 1922, 76 p. »Ses

rakontoj el la verko Koro. Nin ĉarmas infankoroj, amaj, oferemaj, noble fieraj, kompatemaj, sindonaj, herojaj. La lingvaĵo estas ĝenerale bona, flua kaj viva.» (LM, 1924, p: 36.)

Italujo. Komenco. Unuaj organizoj kaj kongresoj, 1889—1912. La unua propagando konsistis kaj limiĝis je persona laboro de kelkaj pioniroj, antaŭ ol oni komencis ian organizitan movadon. En 1889 estis eldonita en Crema la unua lernolibro por italoj, kiun verkis Daniele Marignoni (nask. en Crema 1846, mortis tie 1910). Aktivaj pioniroj estis la franco Alberto Gallois, kiu en 1903 iniciatis propagadon en Riolutato (Modena) kaj fondis la Ita'an Societon por la Prop. de E. Li tradukis francan lernolibron de Cart, kaj en 1902 en Torino eldonis malmultnombrajn numerojn de gazeto L'E-ista; kunlaboris Marcello de Balzac kaj G. Giovanni.

Preskaŭ samtempe la angla poeto Clarence Bicknell, kiu de 1877 vivadis preskaŭ ĉiam en Italujo kaj Egiĝis en 1897, propagandis por E en Bordighera, kie li fondis en 1910 E-grupon. Samtempe kun la agado de la menciitaj pioniroj (v. pri aliaj en la biografioj) en norda Italujo, en la plej suda parto, en Sicilio, komencis propagandi (1903) d-ro Vitangelo Nalli, kuracisto, kiu starigis en Palermo en 1906 la asocion »Sicilia Fed. E-ista« kaj fondis la revuon Idealo. La ministerio de publika instruado kaj la urbestroj de Palermo kaj Siracusa akceptis esti patronoj de SFE. — Dum la unuaj jaroj de E-ismo en Italujo, meritas mencio el la pioniroj adv. Raffaele Bagnulo, Giovanni Cacciapuoti (ekde 1902—03), kiuj en Napoli aperigis en 1902 gazeton L'E-ista; en 1903 fondiĝis E-grupo en Napoli. Precipe per la agado de pastro prof. Luigi Giambene starigis en Roma (1905) la EG »Imperiosa Civitas«. En 1907 aperis gazeto Roma E-isto, kiu en 1908 eldonis la unuan jarlibron de la italaj E-istoj. — En 1907 aperis en Udine la gazeto E-abelo. En 1906 Bicknell kune kun prof-ino Rosa Junk (el Aŭstrujo) starigis la E-grupon en Milano. Aliaj grupoj starigis en Perugia (1908), en Genova (1910), en Sampierdarena (1911) ktp.

Landa societo ekestis en Bologna (1911).

La vera komenco de nacia E-movado okazis en 1910. Jam 30 dec. 1905 fondiĝis en Firenze grupo, kies oficiala bulteno estis la unua regiona E-gazeto (1905); inter la pioniroj de tiu movado meritas apartan atenton Cicetti, Dattari, adv. Viterbo. En Firenze mem starigis kun pluraj grupoj en 1910 Itala E-ista Federacio (IEF), kies unua ĝenerala kunveno (1-a kongreso de italaj E-istoj) okazis en Firenze 21—23 marto 1910. Prof. Corrado Grazzini en Firenze organizis nacian asocion inter E-istaj instruistoj; tiu ĉi asocio estis en 1916 reorganizita. Scarselli en Firenze verkis en tiuj jaroj la »Marŝon de la E-istoj«.

IEF (ankoraŭ nun ekzistanta) jam de komenco celis la propagadon por E kaj la organizon de la italaj E-istoj en grupoj. Ĝi ĉiujare organizis la nacian kongreson.

Unua organizo por instruado de E estis »Liguria Instituto de E« starigita en Genova en 1910 de d-ro Alfredo Stromboli, kiu en tiu jaro fervore propagandis, starigante en 1911 la Asocion IEA, kiun li prezidis, kaj la 2-an nacian kongreson en Genova en 1911. Ankaŭ IEF havis en 1911—12 sian sidejon en Genova (prez. pastro prof. Ilario Focco, sekr. f-ino Gemma Segré) kaj la nombro de ĝiaj grupoj estis 13.

La 3-a kongreso de la Italaj E-istoj okazis en Verona 6—8 aŭg. 1912.

Tre grava branĉo de IEA estis E-a Kooperativo, fondita en Genova antaŭ la milito, kiu eldonis multajn prop. foliojn (ĉefe tiun tre utilan kompilitan de Cesare Cadario) kaj multajn gramatikojn kaj broŝurojn. Pro la milito la Kooperativo devis ĉesigi sian agadon. Cadario je la fino de 1912 iris al Torino, kie li sukcesis kun helpo de inĝ. Balzac kaj Mario Muretti starigi grupon kaj organizi kursojn. Samtempe tre disvolviĝis la propagando en Villar Perosa, age de la tre aktiva Dante Randi kaj en Torre Pellice age de prof. Vinaj.

La 22 apr. 1912 starigis la Itala Katedro de E (IKE) zorganta la instruadon de E.

Itala E-ista Federacio. Na-

cia kongresoj. 1912—32. En 1913 la sidejo de IEF translokiĝis de Genova al Milano (prez. d-ro Angelo Filippetti, vicprez. Oscar Büemann kaj d-ro Jona, sekr. Don Enrico Violi kaj Samuele Falieno). En 1914 ĝi restis la sola nacia societo por prop. kaj organizo, ĉar IEA ĉesigis sian agadon. En 1913 okazis en Milano la 4-a nacia kongreso de E.

En la militjaroj 1914—18 la tuta movado malpli vigliĝis. En 1914 estis aktivaj grupoj en Bologna, Cremona, Genova, Sampierdarena, Milano, Roma, Verona, Venezia, Taranto, Torino. Krom IEF ekzistis tiam du regionaj federacioj: Venecia EF kaj Emilia EA. En 1915 provizore oni starigis oficejon de IEF ĉe sidejo de IKE en Bologna, ĉar praktike la Federacio, pro eniro de Italujo en la militon, ĉesigis sian aktivecon. En 1916 starigis Provizora Komitato por reorganizo de IEF ĉe la grupo de Cremona (prez. prof. Silvio Marchi, sekr. Aldo Mandelli), sed pro la ĝenerala situacio la reorganizo ne povis okazi. En 1917 funkciis kiel provizora sekr. de IEF C. Cadario en Genova. Por vivigi eĉ dum la militaj malfacilaĵoj la Federacion, Cadario laboris multe per cirkuloj kaj li reaperigis per sia propra mono la gazeton *Itala E-isto*; lin helpis precipe Attilio Clavenna kaj Ettore Managlia, ambaŭ en Genova. En 1918 Cadario devis iri al Roma kaj tiam li transdonis la sekr. oficon al Managlia, kiu poste ĝin transdonis al E-istoj en Milano. Dum 1915—18 evidentigis sian agadon la grupoj de Bologna, Busseto, Cremona, Firenze, Genova, Milano, Padova, Rimini, Siracusa, Treviso, Verona, Udine.

En 1919 post la kunigo de la provincoj Trento, Trieste, kaj de la aliaj regionoj kun la itala regno ĝis la nuna limo, la grupoj jam ekzistantaj en tiuj provincoj, unuiĝis al la itala E-organizaĵo. 24 dec. 1919 okazis la unua regiona kunveno en Trento.

12 nov. 1919 starigis en Genova Centra Komitato de IEF por ties reorganizo (prez. prof. pastro Modesto Carolfi, sekr. Managlia). 3—5 okt. 1920 okazis en Bologna la 5-a Nacia Kongreso (prez. adv. kav. Neb. Filippo Palmeggiani, sekr. d-ro Umberto Toschi). En tiu ĉi kongreso oni elektis no-

van komitaton de IEF kun sidejo en Milano, konsistanta el d-ro Angelo Filippetti, Aldo Mandelli, d-ro Pier Carlo Monti.

En 1921 vigle laboris grupoj en Bari, Bologna, Cremona, Firenze, Genova, Mantova, Milano, Padova, Palermo, Potenza, Roma, Rovereto, Sampierdarena, Terni, Torino, Trento, Trieste, Verona, Venezia.

La 6-a Nacia Kongreso okazis en Trento 16—17 aŭg. 1921. (Org. komitato: prez. d-ro A. Mondini, sekr. G. Marchetti). Dum la kongreso oni elektis novan estraron de IEF; prez. adv. Attilio Vaona, sekr. prof. Fr. Pizzi. Per nova regularo oni decidis, ke estu elektotaj lokaj delegitoj por helpi la membraron. En 1922 IEF havis 1512 membrojn kaj 52 delegitojn. En tiu jaro fondiĝis novaj grupoj en Brescia, Napoli, Brindisi, Vicenza kaj Catania. IEF ricevis en 1921 monsubtenon de la maristara ministerio.

La 7-a Nacia Kongreso okazis en Trieste 20—22 sept. 1922. (Org. komitato: d-ro Arturo Ghez, d-ro Giuseppe Koch, Carlo Simonis, d-ro Kav. P. Polidori). Oni elektis la jenan estraron de IEF: prez. Vaona, sekr. Toschi, kas. Reni sidejo de la estraro Verona. Oni decidis starigi Libran Oficejon de IEF por eldono de prop. broŝuroj.

En 1923 aperis novaj grupoj en Voghera, Lecce, Soave, Bolzano. La Komerca Cambro de Padova aliĝis al IEF kaj ankaŭ la Komerca Cambro de Reggio Emilia helpas E-n. Granda okazaĵo de ĉi tiu jaro estis en Venezia la Unua Int. Konferenco por Helplingvo en Komercio kaj Turismo, kies aranĝon helpis IEF.

La 8-a Nacia Kongreso okazis en Terni 21—22 sept. 1923. (Org. komitato: adv. G. Pasqualini, f-ino L. Caporali, f-ino N. Biagioni.)

La 9-a Nacia Kongreso okazis en Torino 2—5 aŭg. 1924. (Skr. de la org. komitato ing. Muretti.) Oni elektis novan estraron de IEF, prez. prof. A. Laccalenda kaj d-ro G. Koch. Nova sidejo: Bari.

En 1924—25 estis agemaj grupoj: Bari, Brescia, Castiglioncello, Cremona, Genova, Mantova, Milano, Padova, Parma, Roma, La Spezia, Terni, Tori-

no, Trento, Trieste, Udine, Verona, Venezia, Voghera.

La 10-a Nacia Kongreso okazis en Bari 13—15 sept. 1925 (Org. komitato: prof. Lacaletola, d-ro Koch, adv. Morea). La nova estraro de IEF formiĝis: prez. ĝenerala markizo Carlo Cordero di Montezemolo, sekr. kolonelo Arturo Passerini. Sidejo fariĝis Livorno.

La 11-a Nacia Kongreso okazis en Livorno 19—20 sept. 1926. (Org. komitato: Montezemolo, Passerini). Nova estraro de IEF: prez. Montezemolo, vicprez, ing. d-ro prof. Rinaldo Orongo, sekr. Gernando Morfini. Sidejo: Livorno. En 1926—27 fondiĝis novaj grupoj en Vicenza kaj Como.

La 12-a Nacia Kongreso okazis en Napoli 3—5 sept. 1927. (Org. komitato: admiralo Eugenio Trifari, prof. Nicola Magliulo.) Tiu ĉi kongreso markis specialan etapon en la progreso de la itala E-movado.

La 13-a Nacia Kongreso okazis en Perugia 22—24 sept. 1928. (Org. komitato: d-ro Kav. Guido Ramaccioni, Nazareno Boccioli). Nova estraro de IEF: prez. Montezemolo, vicprez. d-ro prof. Giorgio Canuto, sekr. Aleviano Bisetti. Nova sidejo: Torino. Dum la kongresonistariĝis specialan Delegacion por Eksterlando de la Itala E-movado, kun celoj de kunigo kaj kontrolo de utiligo de E rilate al naciaj celoj en la interrilatoj kun eksterlando. La Delegacio depost sia starigo aperigis en la organo de IEF Bultenon kun sciigoj koncernantaj la eksterlandan E-movadon kaj dissendas al ĉiulandaj gravaj E gazetoj bultenon pri la itala E-movado kaj la plej gravajn faktojn pri Italujo. Estis elektita kaj daŭre funkcias kiel gvidanto de la Delegacio prof. Gaetano Faccioli el Brescia.

Agemaj grupoj en 1928—29 estis tiuj menciitaj depost 1924, kaj la novaj de Livorno, Modena, Salerno. Nombro de la grupoj aliĝintaj al IEF en 1929 estis 18.

La 14-a Nacia Kongreso estis en Udine 28—30 jul. 1929. (Org. komitato: Grafo adv. Gino di Caporiacco, geom. Franco Bodini). Dum tiu kon-

greso okazis la Unua Nacia Ekspozicio de E, organizita de Bodini.

La 15-a Nacia Kongreso okazis en Como 30 aŭg.—1 sept. 1930. (Org. komitato: adv. Giulio Benzoni, d-ro Canuto, Bodini, Rag. Pierino Castiglioni). Dua Nacia Ekspozicio de E kaj Unua Int. Turisma Karavano por E-istoj al Italujo okazis dum tiu kongreso.

La 16-a Nacia Kongreso estis aranĝita en Padova 25—28 jul. 1931. (Org. komitato: grafo d-ro Fr. Giusti del Giardino, d-ro U. Renda, Canuto, Bodini, prof. G. Saggiari). Okazis samtempe la Tria Nacia Ekspozicio de E kaj dua Int. Turisma Karavano al Italujo.

La 17 majo 1931 IEF translokiĝis de Torino al Milano kaj fiksas sian nunan sidejon en la centro de la urbo. Por la unua fojo tie ekfunkciis centra nacia oficejo plenumanta la administran kaj sekretarian laboron de IEF, kaj servanta la tutan italan E-movadon, sub la nomo E-Centro Itala. La Centro servas la Italan Katedron de E kaj la Delegacion por eksterlando. Krome, ĝi zorgas la informojn por la publiko, eldonon kaj vendadon de libroj, organizas turismajn karavanojn, kaj kunvenojn, metas je dispono de la grupoj sian laboron, funkcias kiel renkontoj dank' al sia escepte bona situacio, kontaktas kun ne-E-istaj organizaĵoj kiuj utiligas aŭ helpas E-n.

Dum la unuaj du jaroj la Centro donis pruvon pri sia utileco kaj bona funkciado. Nuntempe ĝi troviĝas en florantaj kondiĉoj kaj en promesplena disvolviĝo. La Centro estis precipe kreaĵo kaj persona verko de ing. R. Orengo; ĝin subtenas »garantiantoj«, inter kiuj estas troveblaj la plej belaj nomoj de italaj E-istoj. Adreso de la Centro: Galleria Vittorio Emanuele 92, Milano. En 1931 la estraro de IEF estis jene elektita: prez. Montezemolo, vicprez. Canuto, sekr. Paola Mellina; membroj Bisetti, Bodini, Facchi, Grazzini, Ravizza, Tanzi kaj Ventura.

Agemaj grupoj en 1930—32 estis proks. la samaj de la antaŭa jaro; plie estiĝis novaj grupoj en Casale Monferrato, Cordenons, Gradisca, Pallazolo sull' Oglio.

La 17-a Nacia Kongreso okaz-

is en Torino 25—27 jul. 1932. (Org. komitato: Canuto, adv. Giani, kolonelo Saccani k. a.)

Ni rimarkas pri la naciaj kongresoj de la italaj E-istoj, ke ĉe ili estis ĉiam reprezentataj kelkaj ministerioj, kutime tiuj de la instruado, de maristaro, de komerco kaj industrio, de ekonomio. Preskaŭ ĉiam la honora prez. estis la loka urbestro.

La novaj provincoj. En 1918 estis aldonataj al la Itala Regno iamaj teritorioj de la aŭstra imperio. El ili, en provincoj de Trento kaj Trieste kaj en regiono Istrio antaŭ la mondmilito ekzistis vigla E-movado. En 1912 en Trento estis iniciata de grafo Eccli, V. Peratoner, Fr. Gerloni, instr. Pacher kaj aliaj propagando, kiu rezultigis prop. komitaton por E, kies agadon ĉesigis la milito. En Fiume ekzistis grupo jam en 1907, en Gorizia (Görz) en 1911. En Trieste jam antaŭ la milito multe propagandis d-ro Arturo Ghez; en 1913 jam ekzistis »Circolo E-ista Triestino«. En regiono Istrio en 1914 ekzistis Istria E-Unuiĝo. En Isola d' Istria, en Capodistria, depost 1913 oni vigle propagandis per grupoj kaj kursoj kiel en la aliaj provincoj itallingvaj tiam parto de la aŭstra imperio.

Instruado. En 1912 starigis en Bologna nacia instituto por direkti la instruadon de E, kiu nomiĝis Itala Katedro de E (IKE). Fondinto kaj unua dir. estis d-ro prof. Achille Telini. Celoj de la Katedro estis la organizo de kursoj kaj ekzamenoj, la elekto de kapablaj instruistoj kaj profesoroj de E. La Katedro eldonis ĝeneralan regularon kaj regularon por la ekzamenoj. La kunvenoj de la membroj okazis ĉiujare dum la naciaj kongresoj de E. La membroj elektas la direktoron, kaj la Katedro dividiĝas en regionaj Institutoj, kiuj havas sian regionan direktoron. En 1914 Z aprobis perletere la agadon de la Katedro. En 1915 la Katedro eldonis vortareton sub titolo: »Malgranda interpretisto por personoj en milito«. Dum la kongreso en Trento (1921) oni decidis reorganizi la Katedron. Honoraj membroj de la Katedro estas nun (1932) admiralo Alberto Alessio kaj prof. d-ro Bruno Migliorini. En 1922 estis elektata kiel dir. pastro Giacomo Meaz-

zini, kiel sekr. prof. C. Grazzini De tiam la sidejo estas en Firenze. En 1923 ekzistis regionaj institutoj de la Katedro por jenaj regionoj: Emilio, Liguria, Lombardia, Piemonto, Apulio, Lafiumo, Sicilio, Toskanio Trentino, Julia Venecio, Veneciaj provincoj, Umbrio. En 1925 prof. Meazzini memvole eksiĝis kaj de tiam estis dir. C. Grazzini en Firenze.

En ĉiuj menciitaj agemaj grupoj okazis multnombraj kursoj, ĉu privataj ĉu en publikaj lernejoj. Estas speciale menciindaj jenaj kursoj ĉe publikaj lernejoj pro la multnombro de la gelernantoj kaj pro oficiala akcepto de la kursoj mem flanke de la lokaj lernejestroj aŭ urbaj aŭ ŝtataj aŭtoritatoj. En 1911 en Genova (urbaj lernejoj elementaj kaj komercaj); en 1920 en Milano 25 kursoj kun 1100 gelernantoj. Plej multaj kursoj kaj gelernantoj ĉe elementaj lernejoj de la Komunumo de Milano, kiujn gvidis Piatti, Violi, Cattorini, Combi, Camelli, Duchini, Mainardi, Rota, Carbone, Nobile, Ciribini, Comolli; 90 geinstruistoj partoprenis kursojn ĉe Milana Grupo »E-a Domo«. En 1920 kurso ĉe Reĝa Instituto Maristara en Venezia; en 1922 en Bisceglie kursoj ĉe komunumaj lernejoj (gvidis prof. Lacialendola); en Bologna kurso por geinstruistoj; en Cremona en komunumaj lernejoj; en Bari ĉe Reĝa Maristara Instituto (gvidis prof. Lacialendola). Ĉe reĝaj maristaraj institutoj: en Venezia (prof. Pizzi), en Genova (d-ro Schmucker), en Camogli (prof. Arabeno), en Savona; en Palermo (prof. pastro Abbratuzzato). — La kursoj ĉe publikaj lernejoj en Milano daŭris ekde 1920 dum multaj jaroj. En Terni en 1920 kurso ĉe komerca lernejo. En 1923 en Padova kursoj ĉe Reĝa Komerca Instituto; en Firenze ĉe Reĝa Normala Lernejo. En 1924 kursoj ĉe Reĝaj Komercaj Institutoj en Bari (Lacialendola), Palermo (La Colla), La Spezia (Orengo), Trento (Quarta), Genova kaj Napoli. En Bari kurso ĉe Reĝa Maristara Instituto (Lacialendola) en Venezia kursoj ĉe komunumaj lernejoj. En 1925 kursoj ĉe komunumaj lernejoj en Milano, en 1926 kurso ĉe Komerca Instituto Infano (Mazzolini); kurso por geinstruistoj en Roma (Antonelli); kurso ĉe Maristara Instituto

en Bari. En 1925—28 en Brescia kursoj por ĝeinstruistoj de urbaj lernejoj ĉe Reĝa Instruista Instituto, ĉe Reĝa Scienca Liceo (Facchi, f-inoj Bordogna, Mazzuchelli, Zaini).

En 1927—28 kursoj en Bari ĉe Reĝaj Institutoj Maristara kaj Komerca (Lacalendola), en Udine ĉe Reĝa Teknika Instituto, kaj aliaj. En 1929 en Milano kurso por ĝelernantoj de urbaj lernejoj. En 1930 en Brescia kursoj ĉe Reĝa Instruista Instituto, Reĝa Teknika Instituto, Reĝa Supera Lernejo por eksterlanda Komerco (gvidantoj Facchi, Sachs, f-inoj Bordogna, Bettoni). En Milano kurso por ĝeinstruistoj de urbaj lernejoj; en Zara kurso en Reĝa Instruista Instituto (f-ino Minio), en Pola kurso ĉe Reĝa Liceo-Gimnazio (ing. A. Levi). En 1931—32 kurso en Aosta ĉe Reĝa Liceo-Gimnazio; en Pola, Reĝa Liceo-Gimnazio; en Udine Reĝa Instruista Instituto; en Brescia Reĝa Instruista Instituto kaj Reĝa Teknika Instituto (Facchi, f-ino Dragoni) Casale Monferrato, kurso ĉe Reĝa Teknika Instituto.

La Ministerio por Maraferoj en 1920 dissendis cirkuleron al Reĝaj Maristaraj Institutoj permesante en ili instruadon de E; Ministerio de Industrio kaj Komerco en 1923 (28 aŭg. N. Prot. 1428) dissendis cirkuleron permesante enkondukon de E ĉe Reĝaj Komercaj Institutoj kaj ĉe mezgradaj kaj vesperaj Komercaj Lernejoj. La registaraj provincaj reprezentantoj por instruado (Regi Provveditori agli Studi) por Veneciaj provincoj kaj Julia Venecio en 1931 permesis kurson de E ĉe Reĝa Klasika Liceo, Reĝa Scienca Liceo, Reĝa Teknika Instituto en Venezia kaj en 5 profesiaj lernejoj de Trieste.

Permesis la instruadon de E per specialaj cirkuleroj al la estraroj de la koncernaj lernejoj la Urbestroj de: Milano (1920 kaj sekvaj jaroj), Cremona (1922), Roma (1925), Brescia (depost 1926).

Komerco. En 1920, dank' al klopodoj de prof. Giovanni Saggiore, la Int. Specimenfoiro de Padova uzis E-n por sia int. korespondado kaj por siaj reklamiloj. En la Foiro mem malfermiĝis age de la loka grupo E-Stando. En 1921 IEF sendis cirkuleron pri E ĝin rekomendante por komerca uzado

al 80 Komercaj Ĉambroj Italaj. 36 el ili respondis; 12 raportis pri E-movado en sia teritorio; 3 montris sin favoraj. En 1922 la estraro de la Komerca kaj Industria Ĉambro de Padova sendis inviton al la Unuiĝo de la Italaj Komercaj kaj Industriaj Ĉambroj »iniciati ĉe la Int. Komerca Ĉambro la studadon kaj solvon de la problemo de oficialigo de unu sola helpa int. lingvo kaj ĝia disvastigo«.

En 1923 granda okazintaĵo por E en la komerco por Italujo kaj por la tuta mondo estis la Unua Int. Konferenco por Komerca Helplingvo, okazinta en Venezia (2—4 apr. 1923) ĉe la sidejo de la loka Komerca kaj Industria Ĉambro. Estis reprezentitaj en la grava kunveno 201 organizaĵoj komercaj, ŝtataj, regionaj, urbaj, (politikaj, turismaj, lernejoj ktp.): el ili 20 int. specimenfoiroj. Efektiva prez. de la konferenco estis John Merchant de la Komerca Ĉambro de Sheffield; efektivaj vicprez-oj prof. Filippo Ravizza de la Komerca Ĉambro de Milano kaj André Baudet de la Komerca Ĉambro de Paris. La ĝenerala sekretario estis ĉe la Itala Komerca Ĉambro por Svislando (Genève). Tiu Ĉambro iniciatis la organizon de tiu ĉi grava komerca kunveno, kaj ĝia ĝen. sekr. d-ro Chiostergi klarigis al la partoprenintoj la gravecon de la tempo Gravaj deklaroj pri utileco de E estis farataj flanke de la reprezentantoj de la Int. Specimenfoiroj.

UEA kaj IEF multe helpis la organizon de la kunveno, kiun ankaŭ helpis la registaro, italaj komercaj rondoj, lokaj aŭtoritatoj. El la italaj delegitoj parolis tre favore al E tiuj de la Komercaj Ĉambroj de Treviso, Milano, Itala Komerca Ĉambro en Maroko, Int. Specimenfoiro de Padova; kaj la delegito de la Itala Asocio por Fremduloj por la regionoj de Venezia kaj de Lago de Garda.

En 1923 oficialaj deklaraĵoj de la Komercaj Ĉambroj de Reggio Emilia kaj Lecce rekomendis al la komercaj rondoj la uzadon de E. En 1924 dum la Int. Kongreso de Spara Organizo okazinta ĉe la Sparkasa Organizo en Milano, ties prez., membro de la Itala Parlamento, adv. De Capitani d'Arzago esprimis la deziron, ke E estu uzo-

ta pli ĝenerale en venonta Kongreso de la ŝparorganizoj (la Franca Delegito parolis en E dum ĉi tiu kongreso). En 1925 la Komerca kaj Industria Ĉambro de Cremona rekomendis al aliaj Italaj Komercaj Ĉambroj la uzadon de E okaze de sia aliĝo al la Dua Int. Konferenco por komerca helplingvo okazinta tiujare en Paris. En sama jaro la Komerca kaj Industria Ĉambro de Brescia sendis al la delegitoj de UEA en la tuta mondo cirkuleron en E, montrantan situacion de la Itala industrio kaj komerco.

Turismo. La unua E-lingva gvidlibreto en Italujo estas eldonita en 1912 en Ravenna, kies presadon monsubtenis la urbestro. En 1914 la E-Unuiĝo de Genova eldonis 13-paĝan gvidlibreton. En 1921 en Trento oni eldonis ampleksan gvidlibron. Sufiĉe ampleksa estis ankaŭ la bone kaj zorge ilustrita Gvidlibro »Venecio«. En 1926 estas eldonita de la E eldonejo A. Paolet Gvidlibro de Mantova (monsubtenata de la tiea urbestro kaj Komerca Ĉambro). Eldonitaj ankaŭ de A. Paolet estas malgrandaj gvidlibretoj pri urboj Assisi, Bologna, Rimini. Speciale menciinda, absolute komparebla al la plej gravaj int. gvidlibroj estas la gvidlibro Milano kaj lagoj de Lombardio (enhavo tradukita, kontrolita kaj parte verkita de ing. R. Orenge) kies tekston kaj aranĝon prizorgis la granda asocio »Touring Club Italiano, Milano.« Tiu libro aperis en 1931: ĝi enhavas multajn urbajn kaj regionajn kartojn kaj planojn, plej zorge redaktitajn kaj multkoloro presitajn per plej modernaj metodoj.

Turismaj plifaciligoj por kongresoj de E estis ĉiam ricevataj (rabatoj ktp.) pere de italaj Stattervoj kaj pere de Itala Kompanio de Turismo.

En la lastaj jaroj la Itala E-Centro organizis diversajn E-karavanojn de eksterlandaj E-istoj al Italujo okaze de naciaj kongresoj (Como 1930, Padova 1931) kaj de italaj E-istoj al Int. Kongresoj de E. La karavanon al Paris partoprenis preskaŭ 50 personoj.

Katolikaj organizoj. La E-ista movado jam de sia komenco disvastiĝis en la italaj katolikaj rondoj. En 1910 la ĉefepiskopo de Bologna (poste papo Benedikto XV) dekla-

ris sin favora al E. En 1913 la ĉefepiskopo de Milano kaj la episkopo de Pavia skribis al pioniro de E pastro Bianchini laŭdajn leterojn pri E. En sama jaro (4—10 sept.) okazis en Roma la 4-a Int. Kongreso de Katolikaj E-istoj; ĝin prezidis la irlanda pastro Parker; 12 landoj estis reprezentataj.

En 1920 dum la nacia E Kongreso en Bologna okazis la 1-a Kongreso de italaj katolikaj E-istoj, prez. Carolfi, kiu ĉiam estris la E-movadon ĉe italaj katolikoj. La 2-a Kongreso de italaj katolikaj E-istoj okazis en Trento dum la 6-a nacia kongreso. En sama jaro starigis la itala Unuiĝo de Katolikaj E-istoj. La E-movadon inter katolikaj organizoj multe helpis prof. pastro Violi en Milano kaj prof. Pizzi en Venezia. La 3-a Kongreso de italaj katolikaj E-istoj okazis en Venezia 17—18 sept. 1922. La papo sendis benon. Aliĝis kardinaloj La Fontaine (Venezia) kaj Maffi (Pisa). En sama jaro la sidejo de la Unuiĝo estis transportata al Venezia. Dum kongresoj de italaj E-istoj en sekvintaj jaroj okazis specialaj kunsidoj de la katolikaj E-organizoj. Specialaj kursoj de E okazis ofte ĉe Pastraj Seminarioj: ni menciuj tiujn gviditajn inter aliaj en lastaj jaroj ĉe la Episkopaj Seminarioj en Bari kaj Udine.

Fervojistoj. En 1921 oni fondis en Torino la Asocion »Unuiĝo de la Italaj E-istaj Fervojistoj« (sekr. G. Santone). En 1922 ekzistis E-rondoj ĉe fervojistoj en urboj Trieste, Sampierdarena, Venezia. Specialan agadon havis la Fervojista Grupo en Torino kaj tie Beniamino Broglio fondis »Nacian Societon de Italaj Fervojistaj E-istoj« kies grupoj de Torino, Roma, Trieste, Rivarolo, Ligure kunvenis dum la nacia E-kongreso en Torino 1924. Post propagando oni gvidis specialajn kursojn de E por fervojistoj en Trieste (d-ro Koch), Roma (Rag. Filippi), Torino (Ramolfo), ktp. En 1924 la societo havis grupojn en Torino, Roma, Trieste, Voghera, Udine, Mantova, Verona, Gorizia, poste en Napoli. Fakaj kunsidoj de E-istaj fervojistoj okazis ĉe la naciaj kongresoj de E. Nuna gvidanto de la fervojista E-movado en Italujo estas Francisco Ramolfo el Torino.

La estraro de la faŝista organizaĵo »Fervoĵista Postlaboro« (organizaĵo celanta instruadon, sporton, amuzon en liberaj horoj) per cirkulero en 1926 permesis instruadon de E-ĉe siaj sid-ejoj en ĉiuj italaj urboj. La sekcioj de la sama organizaĵo en Trieste kaj Verona enhavigis E-n en sia instrua programo, poste ankaŭ tiu de Roma. En 1927—28 okazis kursoj ĉe la sidejo de tiu organizaĵo en Siena kaj Salerno. La gazeto de la organizaĵo enhavis plurajn artikolojn pri E. En 1931 la nacia societo de Fervoĵistaj E-istoj eldonis »Frazaron por la vojaĝanto« en lingvoj itala kaj E.

Stenografio. Age de direktoroj de sten. asocioj starigis en Napoli en 1928 »Nacia Asocio de stenografoj E-istoj« (prez. prof. Oreste Tafari, sekr. prof. Fernando Quagliarella). Kursoj de E por stenografoj ĉe sten. asocioj okazis en Napoli kaj en Brescia (gvid. Facchi).

Radio. El sendostacio Roma kurso gvidata de Filippi okazis en 1925; el sendostacio Torino kurso gvid. de Canuto en 1929—30. Ambaŭ kursoj vekis grandan intereson kaj konsekvence venis al la gvidantoj centoj da demandoj pri E kaj aliĝoj al nacia movado.

Gazetaro. En 1913 la E eldonejo A. Paolet eldonis monatan revuon L' E' kiu, krom provizora ĉeso pro la milito, aperis ĝis fino de 1922. De 1923 ĝis 1927 ĝia titolo fariĝis Itala E-a Revuo. En 1928 ree ĝi aperis sub la malnova titolo ĝis 1929. Ĉiam tiu ĉi revuo estis sub patronado de IKE, kaj preskaŭ ĉiam ĝi pli-malpli funkciis kiel organo de IEF. Tiu ĉi revuo, kiu respegulis la tutan italan E-movadon, ĉesis en la fino de 1929 kaj estis anstataŭata de la monata Rivista Italiana di E, organo de IKE kaj IEF, eldonita en 1930—31 en Udine kaj direktita de Bodini. En 1932 ankaŭ tiu ĉi revuo ĉesis kaj estis anstataŭata de grandformata gazeto duonmonata L' E' eldonata en Torino (dir. Nicola La Colla). Ĉiuj menciitaj revuoj kaj gazetoj aperis dulingve.

Lernolibroj. El la multaj lernolibroj povas esti citataj kiel plej uzataj aŭ uzitaj, la jenaj, ordigitaj laŭ epoko de ilia apero: Marignoni, Gal-

lois, Giambene, Puccinelli, Rota-Camelli, Cattorini, Stromboli, Pomarici. Nuntempe estas plej ofte uzataj la gramatikoj kaj lernolibroj de Migliorini, »Manuale di E«; B. kaj E. Migliorini, E-a Legolibro; Giani, »Grammatica della lingua ausiliaria E«. Vortaroj plej uzataj: Meazzini (I-E), Puccinelli (E-I), Giani (E-I), Tellini (E-I).

Literaturo. La E-aj tradukoj el la itala literaturo ne estas tiom multaj, kiom el aliaj gravaj literaturoj. Menciante la verkojn laŭ la historia epoko de la pritraktata temo ni povas citi unue la libron »Antikva Romo surmare«, preiego de la registarĉefo Mussolini en 1926. »Mallonga biografio de Sankta Francisko el Assisi« de Carolfi. »La Floretoj de Sankta Francisko«, trad. E-en de Pizzi. »La Pesto en Milano«, eltirajo el romano de Manzoni. »La Devoj de l' Homo« de Mazzini, trad. de Arabeno. »Pri la Devoj de la Homoj« de Pellico, trad. de Tellini. Pri la nuna faŝista regsistemo parolas la libreto »La Itala Laborĉarto«. El la itala literaturo de la fino de la 19-a jarcento ni citu la tradukon de la komedio »Sakludado« de Giacosa, kaj kelkajn ĉapitrojn (»De Apeninoj ĝis Andoj«) de la mondkonata libro la »Koro« de Amicis, trad. de Castagnino; la sama E-isto ankaŭ tradukis la novelon de G. Verga »Cavalleria Rusticana«. La tre konata libro por knaboj »Pinokĵo« de Collodi estas trad. de f-ino Mirza Marchesi. El la nuntempa literaturo precipe menciinda estas la traduko de »Vivo de Kristo«, de Papini. Je la fino de 1932 aperis la traduko de la komedio de Goldoni »Kurioza Okazaĵo«, farita de Mevo. Kaj aŭtune 1933 publikigis en E ĉefverko de la mondliteraturo, »La Infero« de Dante, trad. de Kalocsay (Budapest). La plimulton de la diritaj literaturaj eldonis la E-ista Librejo A. Paolet, S. Vito al Tagliamento. »La Infero« estas eldonita de Literatura Mondo.

Noto. La artikolo verkita en kunlaboro kun la E-Centro Itala.

G. FACCHI.

Ito Eizo Angetu, japano. Nask. 21 apr. 1902 en Ōsaka-hu. Propagandisto de Oomoto kaj Universala Homama Asocio. Lia agmaniero distingigas.

Ito Saburo, (ps. I. U.), japano, soci-alisto, soci-sciencisto. Nask. 1902 en famega familio en Okayama. Studis francan lingvon en fremdlingva kolegio de Osaka. E-isto de 1916. SAT-anigis 1921 (?). Laboris por aranĝo de 10-a JE Kongreso en Okayama. Iniciatis en Tokyo organizon de J Proleta E-ista Unio en 1929 kaj ideologie ĝin gvidas. Bona originala poeto tre malofta en J-ujo, lerta tradukanto de ĉinaj kaj J-aj klasikaj poemoj (kolektitaj en Verda Parnaso, 1932). Publikigis en J-lingva verko Komenco de E-studado en J-ujo, 1932, interesajn priskribojn kaj penetrajn analizojn pri la historio, literaturo, lingvo.

Ito Tokunosuke, japano, prof. de fiziko de Imp. Univ. de Kyusyu. Del. de UEA en Hukuoka. Nask. 11 dec. 1894 en Tokyo. Unu el la gvidantoj de la movado en K. Verkis gusto-plene pri la movado J Sopirante al Verda Steĵo (E. J.), 1923. Partoprenis UK en Kraków.

IUE: Int. Unio E-ista, v.

Iuŝita Juntaro, japano, komercisto. Nask. 15 marto 1901 en Tókyó. E-isto de 1921. Studanto de parola instrumento de E. Gvidanto de konstanta E-kurso en Fremdlingva Lernejo de Tókyó por virinoj. Kunlaboras kun Tasku Sasaki fondante Studejon de Z-a Gramatiko, 1927. (v. Sasaki.)

Ivanov Vselovod (ps. L. Ivn.) ruso, instruisto. Nask. en 1900. E-isto de 1916. Kunlaboris al SAT-organoj, 1923—24. En SAT-eldono aperis de li novelaro Ruĝo kaj Blanko. Tiu ĉi libreto lasas konkludi pri lerta rakontisto, kiu arte reliefigas la kon-

traston inter la malnova kaj nova generacioj. EMBA (SAT).

Ivanski D., (ps. D. J.), germano aŭ polo. Pro vivmizero mortigis sin nov. 1914. Kunlaboris al Int. Socia Revuo kaj trad. kelkajn broŝurojn.

Izgur E., ruso. Nask. en 1881 en ur-beto Berezino, kiel filo de malriĉa laboristo-bakisto. Pro malriĉeco de la gepatroj li ne povis vizitadi ian lernejon kaj jam de la 9-jara aĝo devis labori komence en bakejo, poste li serĉis prosperon en plej diversaj profesioj: pakaj-portisto, kelnero, gardisto, gazetportisto, k. c. Estante 18-jara junulo, li komencis mem klerigi sin sen helpe kaj nur dank' al siaj fervoro kaj neordinaraj kapabloj, havis en tio sukceson. De 1903 li kunlaboris en multaj rusaj, blankrusaj kaj judaj gazetoj. Pro siaj politikaj konvinkoj (komunista) li estis ofte persekutata de la cara registaro kaj dum la civila milito estis verdiktita de la kontraŭrevolucia registaro de Denikin al morto, de kiu li estis savita nur du horojn antaŭ plenumo de la verdikto. En 1921 li estis honorigita de la Tutukraina Komitato de Scienculoj per la titolo »Scienca aganto« kaj en 1922 (por fervora servado al la interesoj de la laborista klaso) per titolo »Heroo de laboro«. Li konis persone d-ron Z kaj al la movado aliĝis en 1903. Krom multnombraj prop. verkoj, al lia plumo apartenas Nurvolu kaj Jelonomo de l'vivo. Dum tri jaroj li estis Konsilantano de SAT kaj de 1928 ano de CK SEU kaj prez. de E-organizaĵo en Kremenčug. I. SIRJAEV.

Izsó (ijo) László, hungaro, presisto. Estis prez. de HESL kaj red. de Antaŭen.

J

Janisto Johannes, estono, instruisto. Nask. 15 marto 1893 en Tartu. De 1930 prez. de Tartua ES, de 1931 landa sekr. de Int. Cseh Instituto kaj vicdel. de UEA. En 1932 estrarano de EAE. Red. de la E angulo en la gazeto »Postimees«. Gvidis multajn kursojn en Tartu.

Jackson (Ĝakson) Wayne, usonano, komercisto. Nask. 16 aŭg. 1895 en Waco (Texas). Prez. de EG de Seattle (Washington); sekr. de Nordokcidenta ES; regiona direktoro de EANA.

Jaĉjo Holm kaj liaj Amikoj. Romano de Holst, el la nederlanda trad. Leewen, ilustrita de Isings. 1933 235 p. »Carma libro pri knaboj, destinita precipe por junuloj, sed pro la interesa karakter-pentro certe leginda ankaŭ por plenkreskuloj.« (y, Lingvo Libro, 1934, p: 13.)

Jadot (jado) Paul, franco (de belga deveno), kontisto. Nask. 27 apr. 1883 en Bas-Oha (apud Liège). De 1908 neĉesis propagandi sindoneme. Sekr. kaj kursgvidanto en diversaj grupoj. Komitatano de la Pariza Fed. kaj de SFPE. Prez. de la prop. komisiono de SFPE.

Jaffe (ĝefi) Saul J., usonano, ekonomisto. Nask. 25 dec. 1894 en Rezekne, Latvolando. E-isto de 1909. Gvidis E kursojn en sia naskiĝa urbo. Propagandas E-n en Flint (Mich.) Oficiale reprezentis ŝtaton Michigan ĉe la UK en Budapest.

Jahns (jans) Käte, germanino, ĵurnalistino. Nask. 2 febr. 1881 en Wolfenbüttel. Laboras multe por virinaj unuigoj kaj por ties gazetoj. Kurfondintino de GEA, sekr. de la grupo en Braunschweig preskaŭ de la fondoĵaro. Gvidis kursojn precipe por labor-

istoj kaj policistoj. Verkis: Erk; Kantotrezoro.

Jakob Hans (ankaŭ Hans Jakob-Notz), svisa civitano, direktoro de UEA deposed 1924; profesio antaŭa: komercisto. Nask. 15 dec. 1891 en Heidelberg (Germ.) Membro de UEA de 1909, delegito en Heidelberg, 1909—12, de tiam oficisto ĉe la Centra Oficejo de UEA: Administranto de la revuo Esperanto ĝis 1914, poste Librejo. De 1920 ĝenerala sekr. Kunlaboranto de JE kaj teknika aranĝanto. Redaktanto de la Oficiala Jarlibro de la E Movado deposed 1924 kaj de la antaŭa Jarlibro de UEA (de 1921). Respondeca afero gvidanto de UEA, konforme al la Statuto Art. 47/48.

Verkinto de multaj artikoloj en E sub ps. Agricola. Verkis serion da artikoloj s. t. Esperantistaj Problemoj, kiuj atestas pri funda kono de nia movado. Pro ofico partopreninta preskaŭ ĉiujn UK kaj multajn naciajn kongresojn, unu el la plej konataj gvidantoj de la movado. Multe okupiĝas per kolektado de plej diversaj aferoj, tamen plej preferata kromokupo estas por li la legado kaj ordigado de lia granda biblioteko privata.

Jalava Leo, finno, direktoro de eldonejo »Suomen Setilas«. Nask. 11 febr. 1892 en Turku. E-isto de 1906. Fondinto kaj unua prez. de »E-a Grajneto« en Turku 1908. Sekr. de »La Polusstelo« 1911, estrarano de EAF 1913—25 (?). Multaj kursoj en Turku kaj Helsinki kaj prop. artikoloj en 1908—13 kaj 1917—22. Kurfondinto de EIF. Kunlaboranto de finnaj E gazetoj, komitatano por UK en Helsinki, 1922. Reprezentis la finnlandan minis-

terion por instruado dum la UK en Nürnberg, 1923. Del. de UEA en Hel-sinki, 1918—25, kaj ĉefdelegito, 1928—1932.

Jamin Joseph, belgo, arĥitekto en Bruxelles. Li multe akcelis la propa-gandon, verkis du broŝurojn; dum 1902—05 estis ĉefred. de La Beiga Sonorilo.

Jammes (jam) Fernand, franco. De 1908 seninterrompe UEA-del. (Le Puv-en-Velay).

Janalíková Antonie, ĉeĥino, instru-istino. Nask. 1874 en Holešov, mortis 1924. Propagandis pacifismon, E-ismon, liberan penson, ktp. Dum la mondmilito arestita pro suspekto de nepatriota sinteno. Multe vojaĝis uzante E-n. Post ŝia morto por honorigi ŝian rememoron, oni eldonis broŝuron, kies kelkaj partoj propagandas E-n efikplene.

Janjić Fran, kroato, d-ro. Tradukis beletristikaĵojn, i. a. Anodo Pring-ludo de D. Simunović.

Jansson Sam (ps. Sjn), svedo, lice-estro. Nask. 9 dec. 1876 en Linde. E-isto de 1921. Prez. de SEI, 1922—30, vicprez. de SEF, komitanto de UEA, nacia dir. de Isolek, gvidanto de ABF duonhoro per radio. Verkis korespon-dan kurson de SEF kaj aliajn E-peda-gogiajn verkojn.

Jansson Sam Owen, svedo, muzea asistanto, filo de J. S. Nask. 19 marto 1906 en Stockholm. E-isto de 1921. Prilaboris svedan eldonon de angla E-lernolibro kune kun sia patro kaj S-E vortaron kune kun Lindén. Sekr., poste prez. de Stokholma EG.

Japana E-isto, oficiala organo de JEA, Tokio. De aŭg.—dec. 1906 ĝi estis nomata La JE. Ĉefred. d-ro K. Kroita kaj d-ro J. Takakusu. JE estis riĉe ilustrita kaj enhavis krom nacia prop. kaj kroniko artikolojn pri la japana vivo, recipe pri la ĉeriz-flora festo, pro kio ĝi baldaŭ akceptis la subtitolon: Int. ilustrita re-vuo, konigas la mondon pri la eks-trema Oriento. De jan. 1914 ĝi aperis tre malgrandigita kaj nur por la prop. en Japanujo. Vol. 1: aŭg. 1905—marto 1907—8 kaj 8: IV+104 p. Vol. 2: apr.—dec.—1907—9 kajeroj 9×IV+174. Vol. 3: jan.—aŭg. 1908—7 kajeroj 7×IV+112 p. Vol. 4: jan.—dec. 1909—

II kajeroj. II×IV+180 p. Vol. 5: jan. apr.—majo 1910—3 kajeroj. 3×IV+64 p. Vol. 6: apr.—okt. 1911—6 kajeroj. 6×IV+60 p. 27×20. En 1912 kaj 13 ĝi ne aperis. Reaperis jan. 1914—10 p. 18×12.

Japana Esperanto-Instituto v. Nipono.

Japanlando, Gvidlibreto pri. Trad. de JEI, eld. de Japana Ministerio de Ŝtatformoj, 1927, 102 p., 37 ilustraĵoj, 9 landkartoj. Bela libro, grava doku-mento pri la progreso de E en Japa-nujo.

Japanujo, v. Nipono.

Jarlibroj antaŭmilitaj. La unuaj ĉefaj jarlibroj en la diversaj landoj kaj Aso-cioj, antaŭ la milito, estas la jenaj (krom la adresaro de Z).

Jarlibro E-ista de la Soci-eto Espero en Peterbur-go (Uppsala, 1897), kun helpo de Klubo E-ista en Uppsala. Ĝi en-havas sciigojn kaj eltiraĵojn pri E, historion pri la ekzistantaj societoj (Nürnberg, Peterburgo, Odessa, Up-sala, Louhans, Societo E-ista en Da-nujo), liston de agentoj de E, de jurna-loj akceptantaj artikolojn, de libro-vendejoj, de libroj jam publikigitaj.

Jarlibro de SPPE (1899—1900). Ĝi enhavas 313 nomojn el 17 landoj el kiuj 169 francoj. Ĝin ansta-taŭis:

Tutmonda Jarlibro E-ista, enhavanta ankaŭ la Adresarojn de Z (eldonejo Hachette), kompilita de De Ménil. Ĝi aperis por la jaroj 1904, 05, 06, 07, 08, 09, 10. En 1908, la kreska-do ne ebligis plu, ke oni daŭrigu plenan nomaron; de post tiu jaro oni enskribis nur la Societojn, Komitatojn kaj Konsul-Agentojn. La lasta aperis en 1910. Ĝin anstataŭis:

Tutmonda Jarlibro E-ista, kiu daŭrigis la antaŭan. Ĝin redaktis Sebert, Chavet, Ferter-Cense (eldoni-ta en E-ista Centra Oficejo). Ĝi ape-ris en 1912, 1913, 1914.

Hispana Jarlibro en 1905 (152 nomoj) — en 1906 (347 nomoj)... en 1910 (1544 nomoj); sed tri kvaron-oj ne pagis sian kotizon.

Jarlibro de Pacifistoj (Pa-ris 1906), redaktita de Moch.

Jarlibro de U. E. A., unua el-dono 1908.

Itala Jarlibro: la unua en 1908 (prof. Luigi Giambene) enhavas ĉ. 1500 nomojn.

Germana jarlibro, unua eldono Dresden 1908, redaktis Schramm.

Sveda Jarlibro: la unua en 1908 (Ahlberg) enhavas ĉ. 1200 nomojn.

Angla Jarlibro: la unua en 1909 enhavas ĉ. 1400 nomojn.

Jarlibro de Centra Asocio Bohema Unio E-ista (Kühnl): la unua en 1909 enhavas 551 nomojn.

Pola Jarlibro: la unua en 1909 enhavas ĉ. 2000 nomojn, sed ĝi kalkulas la poelojn en la tuta mondo.

Jarlibro TEKA. La unua eldono aperis en 1909 kaj enhavis 414 kuracistojn kaj 15 studentojn. La dua aperis en 1910 kaj enhavis 610 kuracistojn kaj 19 studentojn.

Belga Jarlibro: la unua en 1910.

Ruslanda Adresaro: la unua en 1912. Ĝin verkis la studento-grupo ĉe Moskva Universitato. Ĝi dissendis pli ol 20.000 demandfoliojn; 6.000 respondis. Se oni deprenas la poelojn, restas ĉ. 3000 rusoj. L. BASTIEN.

Noto. Artikolo — ne tute komplota — farita laŭ la jarlibroj ekzistantaj en la Biblioteko de C. O., kaj en kelkaj Bibliografioj.

Jarmiloj Pasas. Mondhistorio, originale de H. Haetker. 1931, 500 p. »La historiisto donis en teksto, ne tro longa por laciĝi, bonegan resumon de P tutmonda kaj tuttempa evoluo; per lerta elekto inter citindaj faktoj kaj forigendaj detaloj, li evisit teldon oftan ĉe historiaj lernolibroj. Sinteza kapablo, klara vido, taŭga stilo.« (G. S., 'E' 1932, p: 12.) — »Ĝi estas en la unua triono ne historio, sed hipotezaro; la lingva stilo estas tre peza; historie ĝi ne estas fidinda kaj ĝi estas vere tendenca kontraŭreligia polemikaĵo.« (M. C. B.)

Jarmoloviĉ V. T., ruso. Mortis juna 2 sept. 1916 en batalo en Bukovina. Verkis poemojn en E, kunlaboris je La Ondo de E, Li, Pola E-isto.

Jasuda Jukiĉi, japano, arkitekto de ĉefregistarejo de Formoso. Nask. 1 marto 1904 en Kyoto-si. Dum la stu-

denta tempo en tria nacia kolegio kunkompilis J-E vortareon. Trad. In kubo (dramo), 1924. De 1927 laboras por E en F.

Jaumotte (jomot) Maurice, belgo, ĵurnalisto. Kunlaboris por la UK 1928. Redaktis la francan parton de la Belga Antologio, 1928.

Jaunvalks, Eduards, latvo, poŝtoficeisto. Nask. 10 aŭg. 1901 en Dungada. E-isto de 1918. Kursgvidanto. Fondis ES de Liepaja 1925. UEA-delo en Liepaja 1925—1929. Trad. unuan kolekton de latvaj popolkantoj, 1927. Kunlaboranto de LM.

Javal (javal) Emile, franco, d-ro, fama okulkuracisto. Nask. 5 majo 1839 en Paris, mortis 20 jan. 1907 en Paris. Farigis inĝeniero. Sed, ĉar lia patro estis straba, kaj ankaŭ lia pli juna frato, li provis kuraci sin, li sukcesis, kaj la priokulaj studoj altiris lin; li decidis farigi okulkuracisto. Dir. de la oftalmologia laboratorio de 1878 (dato de ĝia fondo) ĝis 1900. — Post la franca-germana milito de 1870, li dividis sian ĉiunmomentan agemon inter la publikaj aferoj kaj la scienco. Al ambaŭ li dediĉis sian klaran spiriton, senlaca paciencon kaj perfektigemon. Deputito (1885—1889), li sin dediĉis precipe al la demandoj pri higieno. Li voĉdonigis la »Leĝon Javal«, kiu liberigis de ĉiuj impostoj la gepatrojn de sep infanoj. Li eltrovis mem novajn instrumentojn por la okulmezuroj. Publikigis tre gravajn verkojn pri oftalmologio.

J. mem iĝis okulmalsana; dum 21 jaroj li luktis, sed sesdekjara li iĝis tute blinda. Tuj, kun mirindega trankvileco li organizis sian novan vivon, kiun li estis preparinta jam de kelkaj jaroj. Ekzemple li skribis preskaŭ ĉiujn leterojn propramane, per helpo de skriba aparato elpensita de li mem. Li tiris el la sperto de multaj korespondantoj kaj el la sia tuton da perceptoj kaj konsiloj por blinduloj, kiujn li publikigis en la libro »Entre Aveugles« (Inter Blinduloj), kiu tradukis E-en lia bofilino: libro plena de filozofio praktika kaj serena, de filantropio tiel alta kiel kortuŝa. Lia granda pasio estis E. Kvankam de longe varbita al E kiel aprobanto, li praktikis ĝin nur de 1903. Li ĉestis la

Kongresojn en Boulogne kaj Genève, gastigis Z dum lia loĝado en Paris, kaj de tiam ili fariĝis veraj amikoj. Tuj post la Bulonja Kongreso li faciligis la fondon de la E-ista Centra Oficejo (v.) kaj ĝis sia morto li prenis sur sin la ĉefan monhelpadon de tiu institucio, kaj testamentis kapitalon. — Tuj kiam li lernis E-n, helpita de sia perfekta scio de multaj lingvoj, kaj malgraŭ sia aĝo kaj kripoleco, li fariĝis baldaŭ unu el la plej lertaj kaj kompetentaj E-istoj, ĉar li legis al si preskaŭ ĉiujn verkojn, novajn aŭ malnovajn, pri la historio kaj la progresoj de la lingvo. Uzante sian grandan influon, li klopodis fervore por favori la oficialajn progresojn de la lingvo, kaj estas li, kiu agis plej efike por havigi al Z la ordonon de la Honora Legio, okaze de la Bulonja Kongreso. Tre scivolema kaj progremema spirito, ĉiam dezirante perfektigon, li aspiris al reformoj en E, kaj pli ol unu fojon li interparolis pri tiu temo kun Z, kiu fine opiniis danĝera tiun proponon. En siaj lastaj du jaroj li vivis preskaŭ ekskluzive por E. Estis L. K. de 1905.

L. BASTIEN.

Jayet Charles, franco svisa, komercisto en Morges. De 1908 seninterrompe UEA-dĉel. Kunlaboris je la UEA-Jarlibro.

Jeitler (jaitler) Franz (ps. JoFo), aŭstriano, popollerneja instruisto, ŝtate dipl. instr. de E. Nask. 17 marto 1895 en Zistersdorf. Laboras multon por gepatraj unuigoj kaj infanliteraturo. Estrarano de ALLE de 1927 ĝis 1932. Raporto pĉeipe pri la interna kaj kleriga laboro en la grupoj. Artikoloj en »La Socialisto« kaj TEPS.

Je la Nomo de l' Vivo. Filozofi-lirika-jar fragmentoj, originale verkitaj de E. Izgur. 1927. 214 p., multaj ilustraĵoj. »La alta kanto de feliĉa vivo, fajra protesto kontraŭ militarismo, subpremo kaj mizero.« (O. Simon, la Socialisto, 1927, p: 36.)

Jen. Int. gazeto por ŝerco kaj satiro, ilustrita. Red. Pujula. Jul. 1909—majo 1910 en Barcelona. Formato 28x22; 12 kajareroj po 16 p. (Laŭ BIL.)

Jiik Richard, estono, kemiisto. Nask. 14 marto 1905 en Tallinn. Red. de Informoj de EAE, kunlabor-

anto de E Inst. kaj de granda E-Estona Vortaro. Eksestrarano de EAE.

Jobo ps. de J. Baghy (v.).

Jodko Adam, polo, sovetiano, arĥivsciencisto. Nask. 1892. E-isto de 1910. Kompetenta laboranto de CK SEU (Moskva, Minsk). Trad. La Faktoro de Turgenev, 1914; verkis prop. broŝuron. L. K. 1925—33.

Jofre S. Alberich, kataluno. Nask. 7 aŭg. 1897 en Barcelona. E-isto de 1913. Kunlaboris al KEF, Int. Floraj Ludoj, estis red. de K. E-isto, 1926—27. Verkis prop. artikolojn, originalajn kaj tradukitajn literaturaĵojn.

Johano, la Brava. Poemfabelo de Petöfi, el la hungara trad. Kalocsay. 1923, 88 p. »Carma, okazo-plena, idilia versarkonto, vestita en popularan stilon. Tre konvena por legigo dum progresaj kursoj.« (Totsche, De Paĝo, p: 87.)

Johansson (juhanon) Carl Johan, (ps. Joĉjo; Li; J-n), svedo, kunlaboristo de gazeto Social-Demokraten, Stockholm. Nask. 22 marto 1890 en Eskilstuna. E-isto de 1907, estis iama estrarano de EG en Eskilstuna. Fondinto de Lab. EG en Stockholm, estis sekr. de SLEA. Prez., poste sekr. de Lab. EK en Stockholm, estrarano de SEI. Multaj kursoj deposit 1908, pĉeipe inter sindikatoj. Sukcese pri-laboris favorajn decidojn de socialdemokrata parti-kongreso. Multaj artikoloj.

Johansson Gustav Edvin (ps. Geji), svedo, librobindisto-mastro. Nask. 4. nov. 1898 en Falun. E-isto de 1916. Prop. paroladoj, kursgvidado (laŭ Cseh-metodo), organizado. Interpretis prelegantojn. Lerta gramatikulo. Kunfondis E-distrikton en Dalekarlio kaj SLEF. Multaj artikoloj.

John (jon) Sári, hungarino, oficistino. E-isto de 1929. Bibl. de HES kaj sekr. de la ekzamena komitato. Gvidas kursojn laŭ Cseh-metodo.

Johnson (ĝonsn) Ernest Bertram, anglo, helpadministranto en kuirista fako de brita mararmeo en Portsmouth. Nask. 14 okt. 1889 en P. E-istiĝis en 1909. Dum pluraj jaroj gvidis la grupon en P. ĉiuflanke.

Johnson (ĝonsn) Wilfred B., anglo, argentometiisto. Nask. 29. dec. 1903 en Sheffield. En 1908 transloĝigo en

Birmingham-on. E-isto de dec. 1924. Instruas E-n sub la loka komitato de Edukado. Del. de UEA, kontrola ekzamenisto de BEA. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Johnston (ĝonston) Georgo Jame-son, irlandano, d-ro, prof. de ĥirurgio en Dublin. Mortis okt. 1926 en Dublin. Aliĝinte al BEA en 1909, li estis unu el la vicprez. de IEA. En 1913 estis prez. de TEKA.

Jokl Hugo, ĉeĥa aŭstrianano, gimn. prof. por historio, ĉeĥa lingvo kaj geografio en Wien. Nask. en Pacov (Ĉeĥosl.). Membro de la ŝtata ekzamenkomisiono. Gvid. E kursojn. Estro de Bohema Klubo E-ista en W. Raportanto de ĉeĥaj gazetoj en W. pri E. Ĉeĥa lernolibro de E kun d-ro E. Pfeffer.

Jonescu-Capatana (jonesku-kapacana), rumano. Nask. 27 marto 1915 en București. E-isto de 1931. Sekr. de RES. Red. kaj eld. rumanlingvan »Vegetarismul« kaj la Vegetarano, organo de Int. V. Ligo E-ista, kies ĝen. sek. li estas.

Jóó (jó) István, hungaro, d-ro jura, urba konsilisto en Debrecen. Nask. 19 aŭg. 1886 en D. E-isto de 1903, la unua en D., kie elkreskis vigla E movado el lia amika kaj konatula rondo. La unua kaj la nuna prez. de la loka grupo. Poemtraduko en LI, 1905 (L. H. Heroldo, 1930. n-ro 4.)

Jørgensen Poul, dano, instr. mezlerneja. Nask. 24 jan. 1905 en Ordrup. E-isto de 1924. Prez. de Konversacia EK en Kopenhago de 1930, estrano de landa societo.

Josif F., rumano, d-ro, kapitanokuracisto en București. E-isto de 1923. Tradukis el rumana lingvo por LM kaj HDE.

Joŝino Sakuzo (-zoo), japano, prof. de Jura Fakultato de Imperia Univ. de Tókyó. Dum kaj post la mondmilito multe gvidis junularon al demokratio. Nask. 29 jan. 1878 en Miyagi-ken, mortis 18 marto 1933. En 1905 interesigis je la artikolo de W. Stead en »Review of Reviews« kaj ĝin tradukis por »Sinzin«.

Jovanoviĉ P. Jovan, serbo, pens. inspektoro de ministerio por popola klerigado en Beograd. Eldonis en 1908 la

unuan serban lernolibron. Retiriĝis de la movado.

Jozef kaj la edzino de **Po'ifar**. Romano originale verkita de Bulthuis. 1926, 388 p. Spritaj lokoj, amuzaj ĉapitroj, lerta arango, bonstila prozo. (G. S., E' 1927, p: 185.)

Joziciĉ Antonija, kroatino. Antaŭmilita pioniro. Trad. en 1913 la rakonton La Konfeso de Milka Pogaĉiĉ.

Jugoslavio. E-istoj el la urbo Zemun, ĉijare enurbigita al Beograd, nomis sian organizon »EK Mojsije Paĉ«. Per tiu ĉi nomo ili interligis kun la E movado aŭtoron de apriora mondlingvoprojekto, M. Paĉ, kiu en 1859 en Zemun eldonis sian universalan, per arabaj ciferoj kunmetitan skriblingvon.

Forpasis jaroj kaj nur antaŭ 25 jaroj aperis la unuaj sudslavlingvaj lernolibroj sur la teritorio de nuna J., malgraŭ tio, ke izolulaj E-istoj jam ekzistis inter ili advokato d-ro Haas en Maribor (jam mortinta) kaj (laŭ UEA-jarlibro 1928) M. Avramoviĉ, en Beograd, 1904. En 1908 eliris el diverslokaj presejoj, tute spontane la kroata lernolibro de Mavro Spicer, la serba de Jovan P. Jovanoviĉ kaj la slovena de Ljudovít Koser. Nur post tiu unua literatura preparo naskiĝis samjare la unuaj organizoj: Unuigodo de kroataj E-istoj en Zagreb sub gvidado de Spicer kaj Danica Bedekoviĉ, E-istarondo en Slovenujo, fondita de Koser kaj la Beograda E Grupo kun Siniša Budjevac kiel fondinto, al kiu en la sekvanta jaro en reformita Serba E-ista Societo aliĝis ing. Drag. Andonoviĉ, Rad. Kiajiĉ (kiu eldonis serban lernolibron), Milica Gjuriĉ, k. a.

Tiujn unuajn fajrujojn sekvis kluboj en diversaj urboj kaj urbetoj precipe en Kroatujo, kie ekzistis jam la unua interligilo Kroata E-isto, kreita kaj red. de la pioniro Spicer kaj diskoniginta inter alilandaj E-istoj la hejman literaturon. Post du jaroj, en 1910 ekaperis Serba E-isto, eld. kaj red. de ing. D. Andonoviĉ, certe kiel sekvo de la propagando, farita de rusa E-isto Evstifejev, kiu en 1909 vizitis Beogradon kune kun la bulgara E-isto I. H. Krestanov.

En postsekvaj tri jaroj aperis la unu-

aj beletristikaj verkoj »La trezoro de P' orajisto«, historia romano el la 16-a jarcento de kroata verkisto A. Ŝenoa, trad. de Fran Kolar, la kroata antologio kun detala lit-historia enkonduko »Kroataj Poeziaĵoj« el la plumo de Spicer kaj la rakonto de Milka Pogačić, »La konfeso«, trad. de Antonija Jožičić. Menciindaj estas ankaŭ du kantoj el la eposo »La morto de P' Smail-agao Ĉengiić, trad. de D. Bedeković kaj I. Štalter en la gazeto K E-isto. Tiutempe agema Spicer verkis diversajn poeziajn pri-E-ajn proprajn beletristikajn artikolojn, studojn, rakontojn kaj poemojn por hejmaj kaj alilandaj nacilingvaj kaj E-gazetoj kaj okazigis en provincaj urboj paroladojn.

Sur la faka, la ekonomia kampo, la unua eklaboris d-ro P. Stanišić en Zemna, aperiginta la broŝuron »La reforma mono de Silvio Gesell.«

Inter aliaj antaŭmilitaj pioniroj en J. troviĝas geedzoj Kellek, Zora Zupić, Slavko Dragić, Paŭlo Kastner, I. Stemberger, Stjepan Vidak, Nedeljković.

La movado iom post iom ekdormis dum la balkanaj kaj la mondmito, en kiu lasta la naciisma revolucio de sudslavaj serboj, kroatoj kaj slovenoj finiĝis per ilia unuiĝo en la sendependa ŝtato Jugoslavujo (Sudo-Slavujo). En la nova lando la movado ekmarŝis kun freŝa forto. Veikiĝis malnovaj, fondiĝis novaj organizoj neŭtralaj kaj fakaj: laboristaj, studentaj, fervojistaj, ŝakaj, vilaĝanaj, instruistaj, blindulaj. La centro de la movado funkciis en Zagreb, kie okazis ankaŭ la unua Sudslava E-Kongreso en 1923, kaj agadis tie la Sudslava E-Ligo kaj Sudslava E-Servo (eldonejo kaj vendejo de libroj) sub gvidado de d-ro Dušan Maruzzi. La aranĝon de la 2-a enlanda kongreso en Split en 1924 kunhelpis kiel daŭrigo de hektografita, jam presita Konkordo, sub bonstila redaktado de d-ro J. Domac, kiun en 1925 sekvis I. Rotkvić. En tiu organo per beletristikaj vikle kunlaboris N. Hohlov, M. Solovjev, F. Janjić, F. Ŝlogar, Skito, J. Manojlović, M. Spicer, S. Balkanano, Djuro Vojković, Viktorina Lichtenwaller, R. Rakuša, L. Kitzler, D. Radovanović, N. Slavić. Krom tiu ga-

zeto en 1924 post fondiĝo de la Int. Asocio de Fervojistaj E-istoj, kies sidejo kaj estraro estis en J., ekaperis ankaŭ la faka organo fervojista sub gvidado de St. Stojnić kaj Ilija Puhalo. (»La Fervojisto«.)

El la aperintaj literaturaj verkoj estas menciindaj »Ano de P' ringludo« de Dinko Šimunović, E-igita de d-ro J. Janjić en 1926, »Orientaj fabeloj« de Dorošević, el rusa trad. N. Hohlov kaj de la sama aŭtoro la originala komedio »La morto de la delegito de UEA«, uzata sur scenejoj, originala rakonto »La diino de la maro« de S. Balkanano, »Oro kaj paco« de Silvio Gesell, trad. de d-ro P. Stanišić, kiu en la sama jaro 1926 kun samcelanoj el Germanujo eldonis kaj kunredaktis la ekonomisciencan revuon »La nova ekonomia politiko.« Krom tiuj libroj aperis lernolibroj de Maruzi, Agorić, Dobravec, propr. broŝuroj, ŝlosiloj, vortaroj, inter ili la plej zorge prilaborita tiu de Niko Bubalo.

En la movado partoprenis multnombraj propraj-istoj el diversaj regionoj, inter ili krom la jam cititaj: d-ro Crlenjak. M. Nešić, Rupčić, Herkov, Dinko, Baselli, Bertolli, d-ro Pečić, prof. Novljan kaj Ŝaj, Ferhad Kapetanović, prof. Tavčar, d-ro Rosenstock, M. Monić, Drad. Wranka, L. Prebil, d-ro Winterhalter, Dobravec, Rajšić, d-ro Sidorenko, Spitzer, Schneider, Agorić, Kozlevčar, Golobić, Predrijevac, D. Jovanović, Mišak, Jocić, Lapenna, Jevremović, J. Domanjko, d-ro F. Šalamon, k. a.

Post la 3-a enlanda kongreso, okazinta en 1926 en Maribor la movado sub influo de enŝeliginta ekonomia krizo same kiel sub premo de akriĝintaj politikaj cirkonstancoj ekstagnis. La Ligo, ne povinte aprobigi siajn statutojn, ne povis solidarigi la latentajn fortojn. La jam preparita 4-a kongreso en Sremska Mitrovica en 1928 ne okazis. La Liga estraro plejparte translokiĝis al Maribor, kie la sekretariajn aferojn gvidis d-ro Winterhalter kaj la Konkordon samloke redaktis L. Kitzler. Post inaŭguro de provizore senparlamentara reĝimo per la reĝa akto de 6 jan. 1929 komenciĝis malfavorigo aŭ fermado de E-istaj or-

ganizajoj kaj kelkloke persekutado de funkciantoj. Ankaŭ akuzoj antaŭ la ŝtatjuĝejo okazis, sed ili montriĝis nur vanaj senargumentaj suspektoj flanke de policaj organoj, entute ne sciantaj la lingvon. Pro tiaj cirkonstancoj fine en 1929 ekmutis la vigla interligilo »Konkordo«.

Ĉiun defluon sekvas affluo. En plej malfavora medio ekbatalis Beogradanoj, reorganizis la societon en printempo 1930 kaj per aranĝo de kursoj, regulaj semajnkunvenoj kun devigaj paroladoj kaj diskutoj, per radioprelegoj kaj paroladkurso plifortigis siajn internajn fortojn. Formiĝis laborista kaj ŝaka sekcioj. La societo pere de sia prez. d-ro Stefanĉiĉ kun la edzino kaj L. Prebil partoprenis la bulgaran kongreson, okazinta en Sofia en 1930, kie kunsidis la Balkana E Konferenco, kun reprezentantoj el Bulgarujo, Jugoslavujo, Grekujo, Rumanujo. Ĝi i. a. decidis eldoni komunan organon Balkana Konkordo, kiu en la sama jaro ankaŭ aperis kun plejparte beletristika enhavo kaj kies jugoslavujan parton redaktis I. Rotkviĉ. Samjare en Zagreb formiĝis post kunvokita konferenco prepara komitato por reorganizo de la Ligo. Laŭtigiĝis voĉoj, postulintaj denovan kunveniĝon de la E-istaro. Tiun taskon prenis sur sin la filio de la Beograda societo en Subotica sub gvido de E. Weis. La plano sukcesis. Post sesjara interrompo la samideanaro de J. kunvenis en printempo de 1931 en la plej norda urbo Subotica. La bone vizitita kunveno tuj dum la malferma kunsido sin proklamis 4-a kongreso inaŭgurante novan periodon de la enlanda movado. Sub prezido de R. Klajiĉ, St. Vidak, M. Nešić kaj I. Rotkviĉ la kongreso post ĉiufanka pri-traktado de la E-isma problemo surbaze de la koncerna parolado de J. Stefanĉiĉ akceptis unuanime la internan ideon pri l' unuigo de ĉiuj nacioj kaj popoloj en unu Internacio kiel gvidideon de sia estonta agado. Konstatinte plue, ke la prepara komitato de la Ligo pro eksteraj kaŭzoj ne sukcesis funkciigi la centran organon dum unu jaro, la kongreso komisis la komitaton de societo Beograd ĝis la venontjara kongreso okazonta

en Slav. Brod, finsolvi la demandon de la Ligo.

Surbaze de tiuj decidoj la societa komitato en Beograd ekagis kiel prepara Liga estraro, kompilis la statutojn kaj ĝis printempo 1931 ilin aprobis kun oficialigita interna ideo. Ekaperis litografita Bulteno kun laboristaj sciigoj sub redaktado de S. Zivanoviĉ, resp. d-ro J. Stefanĉiĉ. La renovigita antaŭpuŝo donis impulson al disigi'aj organizoj. Freŝaj fortoj F. Homar, d-ro Kun, presisto Buk, Demetroviĉ kaj Kirchhofer en Slav. Brod preparis la 5-an kongreson, kies programon propagandis bel-aspekta kongreslibreto. Krom ĝi aperis speciala jugoslava n-ro de LM. Sub prezido de la reaktiviĝinta pioniro 70 jarulo Mavro Spicer, R. Klajiĉ, d-ro Dušan Maruzzi, Herkov kaj d-ro Kraus la kongreso akceptis la novajn ligajn statutojn, elektinte por la kuran-taro Beogradon kiel sidejon de la Ligo, sub gvido de d-ro J. Stefanĉiĉ, d-ro M. Begoviĉ Zupaniĉ, d-ro Kraus, Prebil, Dim. Jovanoviĉ kaj F. Homar kiel redaktoro. Menciinde estas, ke tiu kongreso unuafoje funkciigis fakajn kunsidojn de laboristoj, instruistoj, studentoj, abstinuloj, blinduloj.

En samjara julio kiel daŭrigo de »Bulteno« aperis el la presejo Buk en Sl. Brod moderne presita, parte ilustrita monata Liga organo La Suda Stelo (L 55) sub redaktado de Homar kun ideologia, socikultura, literatura enhavo kaj kun speciala laborista paĝo. En la regule aperanta gazeto kunlaboras M. Spicer, prof. Novljan kaj Rakuša, V. Lichtenwallner, S. Zivanoviĉ, Radovanoviĉ, R. Klajiĉ, Herkov, Kozlevĉar, Golobiĉ, d-ro Kraus, Wranka, d-ro Kun, d-ro Stefanĉiĉ, Demetroviĉ, blindulo S. Roth, Kirchhofer, d-ro F. Janjiĉ, I. Rotkviĉ kaj sur la laborista paĝo D. Jovanoviĉ, Lovrekoviĉ, Selem, Anĝelka kaj Danica Jovanoviĉ, Cabriĉ, Mišak, M. Perić, Stojanoviĉ, F. Modriĵan, J. Riznar. Sur ŝaka fako eklaboris T. Krick.

En la eldonejo de LSS aperis ĝis nun la fake prilaborita lerno- kaj legolibro de Novljan, la nacia heroeposo de kroata poeto I. Mazuranoviĉ »La morto de l' Smail Aga Cengić« trad. de Spicer, kaj »Servulraĵo« de J. Ste-

fanĉiĉ, en 6 kantoj kun prologo kaj epilogo poemigita kaj koncizigita soci-heroa rakonto de slovena verkisto I. Cankar »Servulo Jernej kaj lia rajto«. En la eldonejo kaj presejo de la Blindulinstituto en Zemun aperis samtempe »Ni vojaĝas al Jugoslavujo« de l' blindulino Helen Keller, trad. de Branko Rajšič kaj la Brajlskriba eldono de »Servulrajto« kaj de la »Morto de Smail Aga Ĉengiiĉ«. Antaŭ la a.p.e. o de LSS en 1932 eliris krome kelkaj n-roj de memstara Monda Kuriero parte ilustrita informorgano por turismo, trafiko kaj komerco sub redaktado de Nik. Lisac en Sarajevo. Krom literaturaj aperis diversloke broŝuroj pri turismo, flugfolioj nacilingvaj kaj prop. artikoloj en tagaj gazetoj kaj revuoj.

La nombro de l' aktivaj organizoj en la postmilita periodo varias inter 20—30. La agado de la Ligo samkiel ties organo okazas sub influo de soci-sciencia direkto de l' internacianismo. Por substreki tiun novan momenton en la movado de l' E-ismo, la JEL-komitato kunvokis dum la 6-a l a n d a k o n g r e s o, okazinta en Beograd en junio 1933 apartan int. E-konferencon, kies programon ĝi antaŭiiks en la januara n-ro de LSS per la temo: »La ideologia problemoj de l' E-ismo«. Tiu-sence la komitato jam en 1932 sugestis al la E-centro en Genève la kunvokon de speciala int. konferenco de elstaraj E publicistoj kaj prop-istoj por pridis-kuti krom la reorganiza ankaŭ la ideologian problemon. Ĉar tiu propono ne realiĝis, la komitato mem okazigis la nomitan konferencon, kiun aktive partoprenis H. Jakob el Genève, Marta Root el New York, V. Bleier kaj edzino el Budapeŝt, Harabagiu kaj Behron el Bukureŝti, Fuchsmann el Bjalistok. La parolado de d-ro Stefanĉiĉ kaj la prelego de R. Rakuŝa, donintaj la bazon por la diskuto estas publikigitaj en la 8—10 n-roj de LSS 1933. La 6-a kongreso en Beograd imponis per la ĉeesto de la menciitaj E-istoj, krom kiuj partoprenis ankaŭ la negra prelegisto Kola Ayaji. Ĉeestis ankaŭ la protektanto, la prez. de la Scienca Akademio, d-ro Bogdan Gavriloviĉ, reprezentanto de la ministerio por publika klerigado, kelkaj eksministroj kaj pioniroj. La kongreso ak-

ceptis la statutojn de la J-a E Instituto, diskutis pri la eldono de »J Antologio«, ktp. La aliĝo al centro restas pendanta ĝis la 7-a kongreso en Koprivnica. Same dum la Beograda kongreso okazis fakaj kunsidoj de laboristoj, instruistoj, studentoj, ŝak-istoj kaj blinduloj.

Pro la morto de juna, entuziasma kaj impulsemaj F. Homar la komitato elektis kiel redaktoron de LSS d-ron Kun.

Krom la enlanda laboro E-istoj en J. aktive kunlaboras en int. gazetoj, kongresoj, kelkaj reiriĝas, aliaj reaktivigas, novaj fortoj aperas kaj la movado pluen marŝas sub nova devizo:

»Por ni super ĉio la internacio.«

J. STEFANĈIĈ.

Jukl Vlado, ĉeĥoslovako, prof. ĉe la Komerca Akademio en Bratislava. Nask. 12 febr. 1892 en Mannheim (Germanujo). Funkciulo de diversaj E-organizajoj, dum 1911—1913 ankaŭ en Rusujo. Instruis dum vico de sinsekvaj jaroj E-n en sia lernejo. Dum 1933 kunlaboranto ĉe la E-disaŭdigoj en Bratislava.

Julin Teodor, (ps. Jln), svedo, poŝt-oficisto, red. de faka gazeto. Nask. 31 okt. 1880 en Säter. E-isto de 1928, kiam, estante parlamentano, partoprenis la kurson de A. Cseh por parlamentanoj en Stockholm. Vicprez. de EG en Stockholm, ĉefdel. de ILEPTO. Aranĝis kursojn, ktp. Prez. de la trivira komitato por organizi la UK-n St. en 1934.

Julio Ceza:o. Tragedio de Sh a k e s p e a r e, el la angla trad. D. H. L a m b e r t, 1906, 86 p. »La tradukinto nenian penadon ŝparadas, por ĝuste kompreni la sencon, nek por esprimi ĝin per konvene elektitaj vortoj kunligitaj en belsona ritmo.« (A. E. W., B r i t i s h E-i s t, 1906, p: 90.)

Julivert Aulés (fuliver' auleez) Maria, katalunio, prof. de pentro-kaj desegnoartoj. Nask. 31 apr. 1888 en Vendrell. E-isto de 1911, kursgvidanto de post 20 jaroj, div. prelegoj kaj prop. artikoloj. Skribis kelkajn tradukojn kaj originalajn rakontojn, trad. katalunen E s e n c o k a j e s t o n t e c o e l la Fund. Krestomatio.

Juna E-isto estis la kreaĵo de du junaj, entuziasmaj E-istoj: Privat kaj

Hodler en Genève, kiuj unue intencis nur eldoni Genevan lokan organon, sed post la 2-a n-ro JE jam fariĝis int. ligi'o de diverslandaj junaj E-istoj. Dum 1903 aperis de apr. 6 n-roj, ĉiuj hektografiitaj, binditaj ktp. de la eldonantoj mem; de jan.—sept. 1904 ĝi aperis litografiita kun presita kovrilo kaj kun ilustraĵoj kaj de nov. 1904—dec. 1905 presita; la formato estis ĝis tiam 21×14 kaj 24×16, la paĝnombro 4—24. Finan fundamenton ricevis JE kiam en jan. 1906 »Preso E-ista Societo« en Paris prenis sur sin la eldonadon; red. Paŭlo Lengyel, Gazeto por Junuloj, Instruistoj kaj E-Lernantoj. De jan. 1910—dec. 1911 aperis 24 n-roj. IV+16—18 p. 24×15 kun entute 372 p.; de jan. 1912—julio 1914—31 n-roj. IV—VIII+16—24×16. P. TARNOW.

Junck (naskiĝinta Bilek) Rosa, instruistino de lingvoj. Nask. 24 majo 1850 en Tábor (Bohemujo), mortis 27 jul. 1929 en Bordighera (Italujo). Loĝis en Italujo de 1890. E-isto de 1897, deklamis poemon en Boulogne ĉe la unua UK. Fariĝis vicprez. de la grupo en Bordighera. Verkis multajn artikolojn en kaj pri E por italaj kaj E gazetoj. Tradukis »Floro de Pasinto«, 1906? »Kverko kaj Floro«, 1906, ambaŭ de Amicis; trad. en italan la »Fundamento de E«.

Juneco kaj Amo. Legendo el Venecio. Originale de P a y s o n. 1930, 72 p. »Amaventuro de pentristo. Priskriboj de l' urbkvartaloj, de l' markanalo, de sunsubiĝo. Malnova moda novelo, bonintenca. Stilo flua«. (G. S., 'E', 1930, p. 136.)

Jung Teo (komplete: Theodor Karl August Heinrich Jung), germano, pre-sisto, ĵurnalisto kaj eldonisto (E-ista). Nask. 21 dec. 1892 en Meckenheim. En la 15-a vivjaro pro malriĉeco devis rezigni la pluan gimnazian studadon. E-istiĝis en 1909—10. Fondis du grupojn, gvidis kursojn. En 1919 restariĝis (kun aliaj) la Rejnlandan-Vestfalian E-Ligon; fariĝis ĝia estrarano, kaj eldonis en Horrem bei Köln monatan revueton Progreso kiel organon por Revelo. En 1920 sekvis fondo de semajna ĵurnalo E T r i u m f o n t a, kiu en 1925 ŝanĝis sian titolon je HDE. Per tiu gazeto li sukcese helpis revigligi la E-movadon en German-

ujo kaj ankaŭ internacie. Li batalis por konkorda laboro inter anoj de diversaj projektoj de int. lingvo (artikoloj »Ni kaj la aliaj«), poste por unueca laborado inter ĉiuj faktoroj de la E-movado kaj por ilia unuecigo en plilarĝigita UEA. En 1910 li publikigis sub ps. sian unuan originalan rakonton en G e r m a n a E - G a z e t o, al kiu sekvis vico da aliaj sub vera nomo. Dum kelkaj jaroj li laboris pri projekto de »idea lingvo« tutmonda, kiu ideo revenas ankaŭ en lia romano. Skribis multnombrajn artikolojn, poemojn, skizojn, rakontojn en multaj E-gazetoj. Verkoj: L a a l t a k a n t o d e l a a m o, poemo, 1926, rekantita laŭ malnova legendo flue kaj korektforme, premiita per la Natura floro ĉe la 12-aj Int. Floraj Ludoj; L a n d o d e l ' f a n t a z i o, romano, 1927, fantazia, riĉa je romantikecaj aventuroj; S a k u n t a l a, postrakonto, 1927; M i l k a j u n u n o k t o j, postrakonto, 1927; G e r s t ä c k e r: L a ŝ i p ĉ a r p e n t i s t o, 1928, trad. sub ps. Egruho; G u d r u n (postrakonto), 1928. Kuntradukinto de Remarque: E n o k c i d e n t o n e n i o n o v a, 1929. Kunaŭtoro de l e r n o l i b r o, 1929. HILDA DRESEN.

Jungfer Johannes, germana ŝtata oficisto en Lübben. Prez. de la Int. Radio-Komisiono, komisiita de UEA. De jaroj regule kaj sisteme gvidas la prop. laboron en la radio-sfero, redaktas ĉiusemajne E-radio-programon, preparas statistikojn.

Jungschaffer (jungŝafer) Hans, aŭstro-germano, fakinstr. en Ried i. I. Bona prop-isto, gvidanto de EG. Verkis prop. libreton.

Junker August, germano, komercisto. Nask. en Köln. Kunfondinto de Revelo. Prez. de la ekzamena komitato de la E-Instituto. Aperigis originalajn prozaĵojn en gazetoj.

Junularo. Junuloj estas pli koresonaj al idealismo ĝenerale, ol plenkreskuloj, pli emaj entuziasmiĝi kaj allogiĝi je ia ajn movado kun noblaj tendencoj. Pro tio de la komenco mem de la E-movado ili grandnombre partoprenis ĝin kaj ofte ludis en ĝi ne malgravan rolon. Post diversaj provoj antaŭmilitaj en 1920 fondiĝis Tutmonda E-Junulara Asocio (TEJA), celanta

unuigi la E-istajn junulojn. TEJA eldonis dum kelkaj jaroj gazeton E-ista Junularo. Post kelkajara stagno en 1933 TEJA denove pli vigle ekagadis; ĝia nuna prez. estas d-ro W. Perrenoud, St. Gallen. SIRJAEV.

Jürgensen Hermann, germano. Pioniro. Verkoj: gramatikoj, 1903 kaj 1905; Vortaroj G-E, 1904, 2-a eld. 1906; E-G, 1904, 5-a eld. 1912.

Juri Tradukacu, japano, firmano. Nask. 23 sept. 1900 en Kyoto-hu. Bona E-oratoro. Verkis: Frazaro de E-Interparolado, 1925; Modela E-Konversacio, 1928.

Juristoj, organizitaj en la Int. Societo de E-istaj Juristoj. Celoj: krei per E-int. aferajn rilatojn inter juristoj, labori per E por evoluo de la int. kaj kompara juro. Fondita en Genève en 1906 dum la UK. Ĝis la milito la societo kalkulis 160 membrojn; gvidis ĝin prokuroro Degon, ĝen. sekr.; prezidis ĝis nun adv. Michaux el Boulogne sur Mére; ĝia organo estis »La Revuo«. Post la milito gvidis la societon adv. Litauer el Warszawa kaj adv. Liebeck el Berlin, ĝen. sekr. estas adv. Chapron el Le Mans. La societo havas siajn kunvenojn dum la UK. Aperis kelkaj jarlibroj de la societo kaj

en 1932 germana-E jurista vortaro verkita de Liebeck. JOZEF LITAUER.

Javoronkov Viktor Feodosieviĉ, ruso, sovetiano, radiometodisto. Nask. 1 majo 1885 en Mologa, gubernio de Jaroslavl, lernis en Rjazana gimnazio kaj en jurfakultato de Moskva universitato. E-isto de 1908, unua diplomito de Moskva instituto de E en 1911. Ĝis 1914 partoprenis en Moskva studenta grupo E-ista. De 1915 ĝis 1922, laborante en sanitaro vagonaro, li prelegis ĉirkaŭ 350 lekcionojn pri E, kaj gvidis kursojn en multaj urboj. De post 1922 membro kaj kandidato de CK SEU. En 1923 J. iniciatis unuan E-radiodis-aŭdigon en Sovetunio kaj de post tiam dum kelkaj jaroj gvidis E-kursojn el la Moskvaj radiostacioj. Aŭtoro de radiovortareto. En 1922—26 li estis organizanto de E-movado inter rusaj blinduloj kaj fondis E-bibliotekon ĉe Sovetunia Societo de blinduloj. En 1930 estis administranto de ŝtataj kursoj de E en Moskva, multe propagandis E-n inter PTT-istoj, funkciante dum kelkaj jaroj kiel gvidanto de E-fako en centra librejo de PTT-ista sindikato.

Jeleznjakov Vasilij, ruso, sovetiano, fervojisto. Nask. 1894. E-isto de 1912. Prop-isto inter fervojistoj en Samara, Sverdlovsk kaj aliaj urboj.

K

Kaatje. *E e S p a a k*, el la flandra trad. Van der Biest. 1911, XIV kaj 111 p. Teatraĵo de UK 1911. »Sceno en la deksepa jarcento. La tradukinto, kvankam li rimarkeble sentas la simplecon de la rakonto, tamen ne ĉiam ĝin prezentas per simplaj vortoj.« (P. J. C., *British E-ist*, 1911, p:51.)

Kabanov N., ruso, d-ro, privatdocento de med. fakultato de Univ. en Moskva. Estis unu el la plej fervoraj antaŭmilitaj rusaj E-istoj. Estis prez. de TEKA kaj ano de LK. Verkis lernolibrojn (1909—10), tradukis verketojn de Mamin Sibirjak (1909, EBI), Najivin (1915), L. Tolstoj (1912), kompilis legolibron (1909), historion de la E-movado en Saratov (1913). Kunlaboris je *Tra la Mondo*, *La Revuo*, *Oficiala Gazeto*, *E'*, *Danubo*, *Int. Scienca Revuo*, red. la *Bultenon de Tutruslanda E Kuracista Societo*, 1911—14.

Kabe (d-ro Kazimierz Bein), polo, okulkuracisto. Nask. en 1872. En siaj junaj jaroj li miksiĝis en kontraŭrusan movadon, pro kio li estis ekzilita por pluraj jaroj. Tial nur en 1899 li finis la med. fakultaton en Kazan. Li verkis multajn prifakajn librojn kaj artikolojn, fondis la Varsovian Instituton por Okulmalsanoj, kies dir. li estis ĝis nun, kaj la Polan Oftalmologian Societon. Li estas konata ankaŭ kiel amatora foto-artisto. — En la E-a mondo li famiĝis, sub la ps. Kabe, per la traduko de la *Fundo de P' Mizer*o de Sieroszewski, kiu aperis en LI en 1904. Ekde 1906 li estis vicprez. de la Akademio. En 1911 li forlasis la movadon, kaj de tiam tute ne okupiĝas plu pri E. La motivoj de ĉi tiu decido estas ankoraŭ neklaraj,

verŝajne kontribuis en tio ankaŭ personaj kaŭzoj (malpacigo kun Grabowski, Zakrzewski kaj aliaj), sed aliparte estas nekompreneble, ke lokaj kaŭzoj difinu ies sintenon al tia vaste int. afero, kia estas E. Intervjuate en 1931 (L. M. p:144.), li parolas pri neprogreso de E, kiun li ne rigardas solvo de la int. lingvo. Laŭ tio ĉi, do lian »Grandan Rezonon« motivus principaj konsideroj. Kia ajn estis la kaŭzo de lia retiriĝo, la E-istaron vigle okupis ĉi tiu neordinara sinteno, ke iu, ĉe la kulmino de sia E-ista gloro, riĉiginte la lingvon per gravaj laboroj kaj eksterordinara influo, subite, en siaj junaj jaroj, turnas por ĉiam la dorson al la kampoj de siaj riĉaj rikoltoj. Lia nomo fariĝis kvazaŭ la simbolo de apostateco, aŭdante pri »kabeoj«, la E-istoj scias, pri kiuj temas. — La du ĉefverkoj de K. estas: *Vortaro de Esperanto* (vortaro E-a, en kiu la E-ajn vortojn li difinas, tre klare, tre trafte, en ia eleganta maniero) kaj la traduko de *La Farano*, granda romano de Prus. — La granda merito de K. estas lia influo rilate al la evoluo de la E-a prozo-stilo. Lia lingvaĵo estas pura, klara, simpla, vere eleganta, libera de ĉiu naciismo: la »spirito de la lingvo« vivas en lia stilo plenspire kaj sendifekte. Liaj frazoj estas perfekte ekvilibritaj, ĉiu vorto sur sia ĝusta loko. Mankas ĉiu neĉecea komplikaĵo aŭ trologikaĵo; ekz. li preskaŭ ĉiam evitas la kompleksajn verboformojn (estas -inta, estis -anta). Li skribas vere int. E-n, lingvon agable gatan, lude legeblan. Li mem klarigas tion, en la supre nomita intervjuo, per sia plurlingveco, laŭ li: »por havi bonan stilon nepre estas

necese koni minimume tri diversajn lingvojn. Ĉi tio nepre estis vera por la unua periodo de la lingvo, kiam E ne havis ankoraŭ propran spiriton kaj oni ĝin devis krei, sed ĝi pli kaj pli perdas sian signifon per la iom-post-ioma kompletigo kaj memstarigo de la lingvo. — Originale li ne verkis. Laŭ lia opinio, »la lingvo profitas pli multe per la tradukado, ol per libera originala verkado. La originala verkisto ĉiam iel povos eltiri sin, li simple ne uzos malfacilajn esprimojn aŭ simple donos aliajn anstataŭ ili.« Same prava opinio; sed aliflanke la lingvo certe bezonas ankaŭ originalajn verkistojn, kiuj, eĉ se ili malpli evoluigos la lingvon mem, uzos kaj per tio sankcios kaj fikso la profiton akiritan de la tradukistoj. — Verkoj krom la menciitaj: Orzeszko: La Interrompita Kanto; Pola Antologio; Int. Krestomatio; Fratoj Grimm: Elektitaj Fabeloj; Unua Legolibro; Turgenev: Versaĵoj en Prozo; Turgenev: Patroj kaj Filoj.

KALOCSAY.

Kadik Peter, prof. de matematiko en Riga, Latvuj. Mortis en 1924. E-isto de 1892. Aŭtoro de lingvaj studoj. Trad. »Libreto pri transmorta vivo« de Fechner, 1907. (UEA, 1927).

Kaftan Rudolf, aŭstro-germano, instruisto, poste fondinto (1917) kaj dir. de horloĝ-muzeo en Wien. Nask. 13 apr. 1870 en Haslach. Por E eklaboris en 1908, estis kas., poste prez. de EG »Danubio«. Multaj kursoj, ankaŭ la unua kurso por policanoj. Fondis privatan E-lernejon, kiu funkciis ĝis 1917. Laboris ĉiam por la unuigo de la E-istoj en W. Nun prez. de »Viena Unio.«

Kain. Drama poemo de Byron, el la angla trad. Kofman. 1896. 102 p.

Kajaba Makoto, japano, fizika asistanto de Imperia Univ. Tôhoku. Nask. 21 marto 1886 en Sendai, mortis 7 marto 1931 tie. E-isto de 1918. Entuziasma homaranisto, kristano. Kiel preparo al XII-a J E-Kongreso en Sendai, vendis E-kukojn k. a. al la urbanoj, mobilizante pli ol 200 lernejknaĵojn. Kunfondinto de J Kristana E-ista Asocio, Sendai Fratara Klubo (homaranisma societo por interamik-

iĝi kun alinaciaj loĝantoj en S.), Sendai ES, ktp. — (Kuw.)

Kaji Hirokazu, japano, eksdentisto, eldonisto, verkisto. Nask. 17 majo 1898 en Aita-ken. Per sia sola forto li fondis grupojn, redaktis gazetojn, eldonis verkojn siajn kaj aliajn. Eldonis gazetojn Juna Azio, 1926-32 kaj La E-isto, 1927, ABC de E-isto, 1931-32. Fondis en 1931 J E lernejon. Verkis: Komentario al Filino de Maro (Z-a); trad. Patro Revenas, fama dramo de Kikuti; trad. Zamenhof de Drezno; E-J kaj J-E Vortaretoj; Frazfarado; Modelo de leteroj, k. a.

Kalocsay (kaloĉai) Kolomano, hungaro, kuracisto. Nask. 6 okt. 1891 en Abaujszántó. Lernis en Miskolca gimnazio kaj en Budapeŝta universitato. D-ro med. en 1916. Tri jarojn en batalkampo kuracisto. Ĉefkuracisto en Urba Hospitalo por Infektaj Malsanoj de 1929; docento ĉe la med. fakultato B. samjare. Edziĝis en 1929. — Alta, facilgesta viro, kun movigemaj manoj kaj tre karakteriza kapo: longa, ĝuama nazo, profundaj brunaj okuloj, alta nuda frunto, kaj ĉio substrekita de ta ironia, iom diabla ridstreĉo de la lipoj. Li parolas per velura voĉo kaj prononcas la o longe kaj akute, laŭ la hungara maniero. Li scipovetas pianoludi, kaj eĉ komponas. — E-isto ekde 1913. En la postmilitaj jaroj partoprenis la movadon, bona parolanto, evidentigis ankaŭ deklamajn kaj aktorajn kapablojn. Ĉefred. de L. M. dum ambaŭ periodoj, kunlaboris al diversaj E-aj revuoj. — Lia verkaro metas lin sur la unuan rangon de la E-verkistoj: Mondo kaj koro (originalaj poemoj, 1921); Kantanta kamparo (traduko de 101 hungaraj popolkantoj, 1923); Johano la Brava (versa popolfabelo de Petöfi, 1923); La Tragedio de l' Homo (drama poemo de Madách, ĉefverko de la hungara literaturo, 1924); Morgaŭ matene (triakta dramo de Karinty, 1923); Streĉita Kordo (originalaj poemoj, 1931); Lingvo, Stilo, Formo (originalaj lingvaj eseoj, 1931); Rimporetroj (originalaj humuraĵoj, 1931); Eterna Buke-do (tradukita int. poemantologio,

1931); Romajelegioj kaj la Taglibro (poemoj de Goethe, 1932); Parnasagvidlibro (kun G. Warrighien, 1932); Hungara Antologio (la tuta poezia parto, krom 11 poemoj, 1933); La Infero (epopeo de Dante, 1933); Arthistorio de Hekler (traduko, 1934); kaj Enciklopedio de E (redakto de la lingva fako, 1934). — La artismo estas efektive la eble plej rimarkinda trajto de K. Neniu tiel klare konsciis la propran valoron de l' E-a vortmaterialo, la plastikajn eblojn de la sonŝtofo, la elvokivecon de la radikaro. Oni havas la impreson, ke por K. la vortoj vivas per vivo pli intensa ol por ĉiu alia, ke ili longe vibras ĉe lia orelo per pli pura sono, ke li karesas ilin kvazaŭ multekostajn ŝtonojn, ŝanĝante ilian brilon laŭ la lumfalo kaj inkruŝtante ilin en siajn versojn, ĝuste sur tiu loko, kie ili ravas la rigardon. Al tia vortamatoro ĉia trezoro ŝajnas malmulta. Tial li emas elekti en la eŭropaj ĉeflingvoj, kies povoscion ebligas al li vasta memoro, la plej drastajn, la plej pitoreskajn vortojn; el tiuj neologismoj certe pli ol unu velkoes kaj restos nur kiel »kaloĉaismo« — sed la ceteraj enradikiĝos, kaj al li iam ni ŝuldos la saman ŝuldon, kiel la italoj al Dante aŭ la francoj al Ronsard. — Cetero tiu vorta eltrovemo, tiu majstrado super la lingvo ne kondukis lin al ia brila, senenhava verstekniko, al ia poezia ĵonglisteco. Oni aŭdas resoni en liaj originalaj versoj la tonon de profunde humana voĉo; kaj ĉiuj sentoj de la homa koro, amo al infanoj, al la virinoj, al la homoj, al la naturo, ĉiuj meditoj pri la vivsignifo, la sorto kaj la morto potence ĉas en liaj poemoj. Apogita de tre forta humanisma kulturo, lia penso ampleksas ĉiujn temojn, kaj de neniu estas subpremata. Dank' al tiu intelekta povo, al ia klasika koncizo (des pli merita, ju pli vortriĉa li estas!) li atingas suprojn ĝis nun ne alflugitajn en la E-a poezio. (La himno de la »Homo«, ekzemple, estas unu el tiuj punktoj, kie la E-a poezio egaligas kun la alilingvaj; kaj ĝia fino: »la tragika muteco de l' ŝtonoj«, al kiu rifuĝas la poeto for de la civilizaj hontoj, tiuj tri

vortoj, ŝajnas al mi tiel potence elvokanta formulo, ke ĝi indas fariĝi unu el tiuj eternaj citaĵoj, en kiu resumigas momento de la homa penso.) — Tiu altnona poeziemo ne malhelpas lin verki versojn jen sprite humurajn (Rimportretoj), jen klare didaktikajn (Arto Poetika): pruvo de mirinde fleksebla talento, kies alian pruvon alportas liaj tradukoj el 22 lingvoj, precipe el la hungara, germana, franca, angla kaj itala (Eterna Bukedo, Infero). — Por redoni en E la apartan harmonion, la individuan atmosferon de la originalo, la tradukisto bezonas esceptajn konojn pri la elvokiveco de la E-a lingvo; se ĝi mankas, la traduko eble estos ĝusta, eĉ eleganta, sed ĝi ne konservos la esencon de la originalo. Simile al malbona gramofono, ĝi ebligas kompreni la sencon, sed la voĉo ne estos rekonebla. La supereco de la K-aj tradukoj estas, ke oni ĉiam rekonas la voĉon, eĉ kiam tio ŝajnis neebla. — Tion oni povis atingi nur per la uzo de pluraj vortoj pli taŭgaj por la poezia lingvo ol la ordinarnaj prozaj kunmetaĵoj. Postuli, ke oni traduku la delikataĵojn de la alta poezio per la sama vortaro, kiun oni uzas en la gazetoj, estas kvazaŭ postuli, ke oni kopiu la Veronez-an »Edziĝfeston en Kana« per la nuraj farbtoj de murŝmiristo. Oni atentu aparte la riĉon de dirmaniero, la flekseblecon de la stilo, la novecon de la esprimilaro, la kompletan utiligon de l' oficiala materialo kaj tradiciaj formoj, kiuj ebligis al la poeto efektiviĝi, kun mirinda facileco, sian gigantan laboron: nur la traduko de la Infero sufiĉas al la gloro de la verkisto, kaj oni ne povas tro emfazi la unuarangan valoron, kiun ĝi prezentas por nia lingvo. Ne plu estas eble, de nun, kontesti la altajn kapablojn de E kiel artingvo. — Ne kompleta estus tiu ĉi skizo, se mi ne menciis la lingvistikan agadon de K. En »Lingvo Stilo Formo«, en multaj recenzoj en la du serioj de L. M. li esprimis ĉiam trafajn, ĉiam sagacajn ideojn pri multaj dubaj punktoj en la gramatiko kaj stilistiko (modo post »kvazaŭ«, la afinaĵo de la virinaj propraj nomoj, la alterno ik-ist ktp. ktp.). Sed la ĉefa

verko sur tiu ĉi kampo estas lia sistemo pri la E-a vortfarado. La eltrovo de la »inversa vortefiko« estas genia klarigo de multaj kunmetitaj vortoj, ĝis tiam konsideritaj kiel ekstermindaj monstroj. Kaj tiun eltrovon li dankas ĝuste al lia fervora amo al la vortoj, kiu ŝajnas ja esenca trajto de la figuro de tiu granda artisto, la plej granda, kiun ĝis nun posedis E.

Liaj pseŭdonimoj: C. E. R. Bumy, Kopar. — y. G. WARINGHIEN.

Kamaryt (kamarit) Stanislav, ĉefo, d-ro fil., prof. de reallernejo en Bratislava, filozofia kaj popularsciencia verkisto ĉeĥoslovaka. Nask. 10 nov. 1883 en Velešín. E-isto de 1900. Laboris inter unuaj pioniroj de la movado en Praha, organizis la movadon en Bohemujo kaj poste daŭre en Ĉeĥoslovakujo en gvidaj funkcioj. Sukcese klopodis precipe pri oficiala enpenetro de E en la lernejojn. Estis ĝenerala sekr. kaj prez. de Bohema AE; de la fondo vicprez., 1930 prez. de ĈAE. Prez. de 13-a UK. Red. kaj kunred. Bohema E-isto; La Progreso. Verkinto de multaj originalaj kaj trad. artikoloj, plue Int. Lingvo (ĉehlingve), 1921, Slovaka ŝlosilo, 1929 kaj Filozofia vortaro, 1933. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Kanado. La unua E-isto en K. estis maljuna katolika pastro F. X. Solis, en la seminario de Saint Hyacin en Montreal, en 1895. Li sukcesis varbi kelkajn E-istojn, kiuj grupiĝis sub lia prezido en rondeto en 1901. La sekr. de la rondeto, P. Beauchemin daŭrigis la komencitan propagandon pere de la loka gazetaro kaj en 1901 fondis prop. revueton L' E-iste Canadien, kiu en 1902 jam aliformiĝis je pli granda ilustrita La Lumo. Baldaŭ sekvis neordinara gazeta pritraktado de la LI, multaj atakoj ekŝtigitaj sur la pionirojn, inter kiuj L. Leymaire kaj A. Saint-Martin estis gravaj defendantoj. Tre agemaj estis tiam aperintaj Klubo Progreso kaj Virina Klubo Progreso. Angla lernolibro, aperinta en Montreal 1903, tre multe helpis al ili en la plua agado. Sed en 1904 La Lumo komencis uzi reformitan alfabeton, kiu elvokis energian proteston ĉe la E gazetaro. La Lumo ĉesis

aperi kaj la movado ekdormis en K. Tamen la malrapida, sed senhalte kreskinta monda sukceso de E efikis ankaŭ al la kanadanoj, precipe kiam la The British E-ist farigis oficiala organo de la K-aj E-istoj. En 1906—07 aperis novaj kluboj en Winnipeg kaj Toronto (R. Sangster), tre sukcese eklaboris la plej malnova Klubo Progreso, granda firmo Vannevar komencis vendadon de E eldonajoj, ekfunkciis Kanada E-Asocio. Grupoj kaj rondoj ekzistas nuntempe en pli ol 10 lokoj. La K-aj E-istoj kune kun la usonaj estas kunligitaj en EANA.

Lau W. G. ADAMS kaj I. SIRJAEV.

Kanariaj insuloj, Afriko. Pioniroj de E estis en 1905 en Las Palmas Alfredo Cabrera, A. Rodriguez Alvarez, F. Gonzales Correa kaj en 1907 en Laguna E. Rivero kaj S. Ferreira, fondintaj la unuan E grupon. Lau la Dietterle-statistiko en 1928 E-istoj trovigis en 3 lokoj, UEA-del. en 1933 same en 3 lokoj. I. SIRJAEV.

Kandid aŭ la optimismo. Romano de Voltaire, el la franca trad. de Lanti. 1929, 160 p., kun ilustraĵoj. »La malbonoj, kiujn kontraŭbatalis V., daŭras ekzisti: maltoleremo, superstiĉismo, fanatikismo, kruelemo, trompemo regas ankoraŭ ĉie en la mondo« (el la Enkonduko), do la verko ne perdis la aktualecon. Stilo rimarkinda pro granda ŝparo de sufiksoj.

Kanev Teodor, bulgaro, sekr. de la komerco-industria ĉambro en Sofia. Nask. 1 marto 1881 en Kalofer, loĝas en Sofia. Trad. de lernolibro de Cart. En 1911 transiris al Ido, en 1922—23 provis organizi Ido-movadon; sen daŭra sukceso.

Kantanta Kamparo. 101 tekstoj al hungaraj popolokantoj, trad. Kalocsay, 1923, 48 p. »Belegaj, perfektaj kaj tamen preskaŭ laŭvortaj tradukoj.« (Abo, L M, 1923, p: 40.)

Kantaro Esperanta. Kompilis M. C. Butler. 1926, 112 p. »358 poeziaĵoj: E-istaj, anglaj, irlandaj, kimraj, skotaj, modernaj, religiaj... kantoj. Traduko lerte kaj ame plenumita.« (G. S. 'E', 1926, p: 102.)

Kantaro Katolika. De L. Chiba. 40 preĝejaj kantoj kun notoj. 1927. 78 p.

Kantas la hungara skolto. Hungaraj kaj skoltaj kantoj kun muziknotoj.

Trad. Baghy, Balkányi, Kalocsay, Mátyás kaj Szikszay. 1933, 40 p.

Kantoj. v. Muziko.

Kantoj de Amo kaj Sapiro. De E. Mihalski. 1934, 48 p. »La kajero entenas poemojn el la jaroj 1917 kaj 1918... La poemoj estas ne seninteresaj provoj de poeta studtempo.« (G. Karczag, »Lingvo, Libro«, 1934, 30. p.)

Kapitalo de d-ro L. Zamenhof, estas fondita en 1897, okaze de la dekjara ekzistado de E, kaj celis eldonadon de diverslingvaj prop. broŝuroj kaj lernolibroj. Ĝin administris la ES »Espero« en Petrograd. Ĝi neniam estis granda, tamen sufiĉis por eldoni anglan lernolibron (n-ro 52 laŭ Z-a nomaro) de Geoghegan (en la dua eldono) kaj prop. broŝuron (n-ro 85) en kelkaj lingvoj. Dank' al oftaj ŝanĝoj de la administrantoj de la societo, la kapitalo post iom da jaroj — tute malaperis. I. ŠIRJAEV.

Karambolo. v. Ritmo.

Karczag (karcag) György, (ps. Q; Kage), hungaro, lingvisto, oficisto. Nask. 14 dec. 1913 en Szeged. E-isto de 1932. Ĉefkunlaboranto de L. M., »Bibl. Gazeto« kaj »Lingvo, Libro«; recenzoj, kritikaj kaj lingvaj eseoj. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Karikaturo. La unuaj karikaturoj pri E aperis en la antaŭmilitaj gazetoj humoraj (La Spritulo k. a.). Antaŭ la kongreso en 1914. Paris la LKK eldonis serion da poŝtkartoj kun karikaturoj pri la plej bone konataj francaj kaj aliaj E-istoj. La antaŭmilita karikaturoprovizo per tio estas finita, krom kelkaj poŝtkartoj. Postmilita ankaŭ manke de ilustrita gazeto kun multaj abonantoj ĉi tiu arto ne povis evolui kaj restis same malofa, kiel antaŭmilita. Post 1933 la apero de la Pirato ebligas iufojan aperon de iuj karikaturoj, en Literatura Mondo aperas kelkfoje kaj ankaŭ aliaj E-gazetoj presigas en la kongresa tempo iujn fotojn aŭ desegnojn, iel rilatajn al la karikaturo. Gravan nombron de tiaj desegnoj ni trovas en la verko »El la verda biblio« de I. Lejzerowicz. Inter la bonaj malmultaj karikaturoj E-istaj ni povas nomi R. Laval (Paris), S. Bartha (Budapest).

Karinthy (karinti) Frigyes, hungaro,

eminenta verkisto. Nask. 25 jun. 1888 en Budapest. Verkis spritajn, valorajn artikolojn pri E. Kelkaj el liaj verkoj: *Morgaŭ matene* (dramo), *Nordavento* (noveloj), *Vojaĝo en Faremidon* (novelo) aperis E-e. De 1932 prez. de HES.

Karl Marx. Lia vivo kaj lia verko. Kompil-E-igis V. Elsudo. 1926, 89 p. »La kompilajo precize informas nin pri unu el la plej gravaj teoriistoj de socialismo.« (G. S., E' 1926, p. 209.)

Karlo. Facila legolibro de Privat. 1909. 9-a eld. 1926, 46 p. 31—40 miloj. »Delikatstruktura romaneto, kiu kun ĉarma naiveco kaj bonhumoro pritraktas la vivadon de junulo.« (kiŝ, L. M. 1925, p. 164.)

Karnas Juul, belglandano, instr., prof. de E ĉe la Antverpenaj vesperkursoj. Nask. 5 febr. 1902 en Berchem (Antwerpen). Kompilinto de *Int. Kantaro*, 1930. Liaj tradukitaj kaj originalaj poemoj regule aperas en la *Flandra E-isto*.

Karolczyk (karolĉik) Stanislaw, polo, oficisto. Nask. 14 apr. 1890 en Lodzo, loĝas en Varsovio. Estis prez. de PEA, vicprez. de postkongreso en V., 1931, kaj kelkajn jarojn red. de *PE-isto*. Poeziaĵoj en diversaj E-gazetoj. Aparte eliris lia libro *Unuaj agordoj* — kolekto de originalaj poeziaĵoj, kiujn li verkis sub ps. Eska. L. K.

Karsch (karŝ) Johannes Waldemar, germano, ŝtata kalkulinspekt. Nask. 7 majo 1881 en Dresden. E-isto de 1908. Sekr. de loka grupo de GEA, 1910—14, ĝia prez. de 1924. Postmilita laboris multe por UEA, ĝis 1934 estis ĝia vicprez. Laboras multe por la turisma servo de UEA. Verkis: *Neue Wege für die Verkehrswerbung* (broŝuro de UEA), 1929. Multaj kongresraportoj k. s. por *GE-isto*, prop. artikoloj por la lokaj gazetoj.

Kastelo de Prelongo. La unua originala E-romano. Verkita de Vallienne 1907, 515 p. »Mi estis kortuŝata, kiam mi ricevis la dikajn volumon... Amoj, ne salonaj, konvenegaj, sed jen sovaĝe pasiaj, amoj kun sango kaj ploro, jen flame, rave malsingardaj. Neniu nenecesa priskribado, neniu filozofa disertacio; vigla rapida

rakonto, simpla stilo, klara lingvo.« (R. Deshays, L I, 1907, p: 473.) Nuntempan kritikanton v. ĉe Vallienne.

Katalogo de la biblioteko (1888—1911) de G. Davidov en Saratov. 1911, 130 p. »En la daŭro de proks. 25 jaroj s-ro Davidov, avarante nek monon, nek tempon, kolektadis E-ajn librojn kaj nun la katalogo de lia libraro prezentas liston de 10.000 nomoj. Inter alie la katalogo enhavas 66 librojn de originalaj verkoj kaj 201 muzik-verkojn.« (B. K., O n d o d e E, 1912, p: 10.)

Katalogo de la Esperanto-Gazetaro. Kompilis kaj komentariis J. T a k á c s, reviziis kaj kompletigis P. T a r n o w. 1934, 168 p. »Ĝi estas ne nur utila, valora, necesa, dokumenta, sed ankaŭ interesa. Ni trovas la titolojn de la E-istaj gazetoj kaj folietoj, de gazetoj, kiuj enhavis E-ajn rubrikojn kaj de gazetoj de la diversaj mondlingvoj. Oni povas aparte trovi en kiuj lokoj kaj landoj aperis la nomitaj kaj statistikon pri 1276 gazetoj el 59 landoj kaj 459 lokoj.« (P. B., »Lingvo, Libro«, 1934, p: 58.)

Kataluna Antologio. Kompilis J a u m e G r a u C a s a s, kunlaboris Josep Grau Casas, Ventura, Amades, Pelliĉer, Sola, Guardiet, Jofré, Capdevila, Torné, Pujula, Rossello, Torrents, Delfi kaj Josep Dalmau. 1925, 416 p. Dua eld. 1931. Enhavo: Studoj pri la katalunaj lingvo kaj literaturo; Antikvaj aŭtoroj; Popolkantoj; Modernaj aŭtoroj. »La libro estas abunda fonto de klasika beleco. Pli ol 50 verkistoj, poetoj kun pli ol 140 prozaj kaj versaj verkoj pledas elokvente por siaj lingvo kaj popolo.« (Jobo, L M, 1925, p: 165.)

Kataluna Esperantisto. Of. org. de KEF. Aperas de 1910; 16—24 p. 24×17. Red. Pujula, poste Dalmau. »Bonega nacia organo, de tempo al tempo nur en E, dediĉita precipe al bela literaturo, konkursado de Floraj Ludoj, nacia E-movado, E-ismo.« (BIL, p: 327.)

Katalunujo. v. Hispanujo.

Kategorio-sufiksoj. La o-finajo, teorie, entenas en si ĉiujn kategoriojn de pensado: **k o n k r e t o** (subkategorio: **p e r s o n o**), **a b s t r a k t o** (subkategorio: **k v a l i t o**) kaj **a g o**, do

ĉiujn ĉi ĝi povas signi. Ekzemploj: **altaj konstruoj** (konkreto, rezulto de ago); **li estas mia fiero** (persono); **la belo** (abstrakto); **dum rapido** (ago); **en ĉi tiuj ekzemploj la radiko mem ne esprimas la ideon per sia radikkaraktero, do la kategorion certigas sole la finaĵo o.** Tamen, sen la helpo de kunteksto tiaj vortoj estas plursencaj, kaj tial la supraj formoj estas uzeblaj prefere nur en poezio. En la ordinara prozo oni fiksas la kategoriojn per sufiksoj: **a ĵ o**, **u l o**, **eco**, **ado**. **A ĵ o** signas konkretajon, **u l o** personon, **eco** kvaliton ĉe adj. radikoj (beleco) kaj abstrakton aŭ kvaliton ĉe subst. radikoj (hom-eco), **ado** agon. La finaĵo **o** restas por signi konkretan ĉe substantivaj kaj abstrakton ĉe adjektivaj radikoj. La analizo de ĉi tiuj sufiksoj okazas per simpla apudmeto (analizo epiteta). Do:

Belo estas abstrakto **belo**;
beleco estas **belo eco**: kvalito **belo**;

belajo estas **belo ajo**: konkreto **belo**;

belulo estas **belo ulo**: persono **belo**.

Konstruo estas **ago** aŭ rezulto;
konstruaĵo estas nepre konkreto (rezulto de) konstruo;

konstruado estas nepre ago konstruo.

Ado servas krome por anstataŭi ĉe pluformado de neverbradikaj verboj la elfalintan i-finajon:

marteli — **martelado**.

Aĵo ĉe konkretaj, **eco** ĉe adjektivaj, **ado** ĉe verbaj radikoj estas propre pleonasmaj. Ĉi tiun pleonasmcon la lingvo uzas por doni al la sufiksoj alian funkcion. Kiel ni vidis, **eco** signas ĉe adjektivaj radikoj **k v a l i t o n** (malsano: abstrakto; malsaneco: kvalito de iu malsanulo). **Aĵo** post subst. radikoj signifas ripeton aŭ daŭron, precipe kun verba finaĵo (adi). Ekz.:

Infano estas konkreto (persono); **infaneco** estas infano **eco**, infano kiel kvalito (stato);

infanaĵo estas konkreto rilata al infano.

P a f o estas ago;
 p a f a d o estas ago ripetata.
 I r o estas ago;
 i r a d o estas ago daŭra.
 v. Vortfarado. KALOCSAY.

Kato (-too) Misao, japano, inĝenier-oficiro. Nask. 23 okt. 1882 en Tôkyô-si. En marto 1906 en Yokosuka fondis la unuan E-grupon en J-ujo »Nippon ES«, kiu fariĝis filio de poste fondita JEA. Verkis memlernolibron por japanoj, 1906. — (KuW.)

Katoh (katoo) Masami, japano, civila aerinspektisto de oficejo de Kwantung distrikto kaj estro de Dairen-aerhaveno, Sudmanĉurio; subkolonelo-aviadisto. Nask. 5 nov. 1888 en Tokyo si. Klarigo pri kelkaj aeronautikaj terminoj en »La Revuo Orienta«, jan. febr. 1930.

Katolika Mondo. La katolikoj havis antaŭ la milito fortan E-an organizaĵon IKUE. Kiel ĉe la laboristoj, instruistoj ktp. ankaŭ inter la katolikoj stariĝis grupo, al kiu ne plu plaĉis burĝmodera konduto; ili fondis en 1920 sub la gvidado de d-ro Metzger en Graz IKA (v.) kun la devizo: Katolikoj ĉiulandaj unuigu vin! Ili eĉ sukcesis unue, gajni ankaŭ IKUE, sed nur por mallonga tempo, ili disiĝis kaj fariĝis kontraŭuloj. En majo 1921 »Ika« komencis eldoni KM en Graz, poste en Zug, London, Elberfeld kaj Koln. La formato estis ĝis 1924 48×32, ĝis dec. 1925 42×29, de jan. 1926—apr. 1928 43×31 kaj apr.—nov. 1928 35—37×25—27. KM estis ankaŭ la organo de la Moka (v.) kaj havis de jan. 1926 kiel aldonon ties bultenon La Juna Batalanto, kiu post la ĉesigo de KM fariĝis memstara kaj samtempe provizore la organo de »Ika«, ĝis apr. 1928 4—8 p. 31×21, majo—nov. 1928 25×18, de apr. 1929 IV+12—24—24×16. De majo 1923 ĝis 1924 KM havis ilustritan aldonon Revuo Katolika, 4 p. 29×21.

P. TARNOW.

Katolika movado. Tuj post la apero de la unuaj lernolibroj kaj vortaroj de Z kelkaj kleraj katolikoj en Rusujo interesiĝis pri la nova lingvo, i. a. la episkopo Zerr en Saratov kaj la profesoro, nuntempe prelado, A. Dombrowski en Kaunas. En Francujo Beau-

front, fervora katoliko, direktis sian atenton, krom al la ĝenerala propagando, ankaŭ al la disvastigado de E inter la katolikoj kaj verkis la unuan E-preĝareton, prezentitan en 1906 al Papo Pio X-a.

Sed la iniciatinto de la speciale kat. E-movado estis pastro Emile Peltier, kiu en 1903 komencis la eldonon de int. revuo *Espero Katolika*. En Boulogne sur Mer (1905) okazis la unua kunveno de kat. E-istoj kaj la unua Kat. E-a Diservo, ĉe kiu, prediki E-lingve, ankoraŭ ne estis permesate. Ankaŭ Z ĉestis tiun Diservon. La sekvantan jaron en Genève Peltier ricevis tiun permeson. En la samaj tagoj atingis lin en Genève la Apostola Beno de Papo Pio X-a. Laŭ la deziro de multaj E-istoj tiu ĉi letero estis legata de la prez. de la UK, la protestanta pastro Schneeberger; la legado estis salutata per unuanimaj kaj longaj aplaŭdoj, ĉar, deklaris Carlo Bourlet, tiu fakto estas tre grava por la propagando de E.

En 1909 dum la UK en Barcelona la Katolikoj okazigis diversajn kunvenojn, kaj tie oni decidis okazigi la unuan Kongreson de Kat. E-istoj en Paris, en 1910. En tiu kongreso IKUE estis fondata. Post la Pariza Kongreso la kat. kongresoj okazis regule ĉiujare ĝis la mondmilito.

La unua postmilita Kongreso, kiu okazis en Hago en 1920, kondukis al konflikto. Dum tiu kongreso d-ro Metzger el Graz, prez. de la Blanka Kruco, iniciatis la fondon de nova int. organizo, nomata Internacio Katolika (IKA), kiu ne estis ekskluzive E-ista, sed kiu uzos E-n kiel sian int. lingvon. Kongreso en Graz en 1921 organizita sub la aŭspicioj de IKA, kie krom E, ankaŭ aliaj lingvoj estis uzataj, pliakrigis la konflikton kaj estis kaŭzo, ke, precipe pro la instigo de la Nederlandanoj d-ro Smulders kaj Schendeler, IKUE, absorbita en IKA, reprenis sian sendependecon kaj reaperigis la gazeton *Espero Katolika*, kiu intertempe estis anstataŭita de *Katolika Mondo*, organo de IKA. IKUE rompita la rilatojn kun IKA, kiu de tiu tempo pli kaj pli perdis la kon-

takton kun E. La kat. kongresoj estis plej organizataj denove de IKUE.

IKUE mem estas unuiĝo de tutmondaj kat. E-istoj, kies celo estas: Laŭeble plej efike servi la interesojn de la katolikismo kaj de la katolikaro per E. IKUE klopodas starigi kat. E-istajn ligojn en diversaj landoj aŭ regionoj; ĝi okazigas int. kongresojn; ĝi faras enketojn pri diversaj movadoj, problemoj, ktp. kiuj rilatas la katolikismon; ĝi ebligas la eldonon de adresaro, revuoj, libroj, kaj aliaj presaĵoj, kaj ĝi starigas servan organizadon en ĉiuj landoj en laŭeble plej multaj urboj.

Membro de IKUE estas nur tiu katolika landa ligo aŭ federacio, kies regularon aprobis la ĉefestraro de IKUE kaj kiu ekzistas el minimume 20 personoj kaj estas paginta la kotizon. En landoj, kie ankoraŭ ne ekzistas membriĝinta ligo aŭ federacio, katolikaj individuoj povas aliĝi kiel individuaj membroj, kondiĉe ke ili pagu la kotizon kaj abonu la oficialan organon. Int. ligoj povas aliĝi kiel int. membro. La oficiala organo de IKUE estas Espero Katolika (v.).

IKUE havas Int. Komitaton, konsistantan el la prezidantoj kaj unu reprezentanto de ĉiu aliĝinta Landa Ligo aŭ Federacio (Ligaj Komitatoj). Tiuj landoj, kie ankoraŭ ne ekzistas aliĝinta ligo aŭ federacio, estas reprezentataj en la Int. Komitato per unu individua membro polande, nomita por tiu celo de la Ĉefestraro kiel Individua Komitato. Int. Ligoj estas reprezentataj en la Int. Komitato per unu membro, nomata Int. Komitato.

IKUE petas la aprobon de siaj statutoj de la Papo, kiu indiku pastron, kiu, kiel »Religia Konsilanto« de IKUE, esploras ĝian agadon. Neniu decido valoras, kiu ne havas la aprobon de tiu religia konsilanto, kiu rajtas ĉeesti ĉiujn kunvenojn. La signo de la IKUE-anoj estas: kvinpinta verda stelo, kun blank-flava kruco.

Jam antaŭ la Pariza kongreso, apr. 1910 (la unua de IKUE) estis starigita la Kat. E-ista Ligo: »Nederlanda Katoliko« (N. K.) en 's-Hertogenbosch, 4 aŭg. 1909, kies samnoma organo aperis ĉiumonate de jan. 1910.

Tiu ĉi modele organizita landa ligo, pro siaj grandnombra membraro kaj vigla agado, ludis de la komenco gravan rolon en IKUE. Baldaŭ sekvis landaj ligoj en Belgujo (al kiu poste ankaŭ aliĝis la redemptorista Pastro W. M. van Rossum, la poste mondfama kardinalo), en Francujo, Germanujo, Anglujo kaj Aŭstrujo.

La nuna stato de IKUE estas: prez. pastro J. Font Giralt, vicprez.: f-ino M. Larroche, Paris. Sekr. kas: P. A. Schendeler, Eindhoven, Prins Hendrikstraat 30-e, Nederlando, vicsekr.: kas.: J. E. Hookham, Teddington, Anglujo.

Landaj Ligoj nun estas en: Aŭstrujo kun 135 membroj; Britlando 73; Ĉeĥoslovakujo 171; Francujo 67; Germanujo 99; Irlando 31 kaj Nederlando kun 934 membroj. La 7 Landaj Ligoj havas ĉ. 1600 membrojn; la nombro de la individuaj membroj en 31 diversaj landoj estas ĉ. 400. IKUE havas do proks. 2000 membrojn en 38 landoj.

Post la Pariza kongreso la Kat. E Kongresoj okazis jene: 2. en Hago 1911; 3. en Budapeŝt 1912; 4. en Roma 1913; 5. en Lourdes 1914; ĉi tiu estis malebligata pro la mondmilito; 6. en Hago 1920. En 1921 ne okazis aparta IKUE-kongreso, pro la Ika.-afero. La 7-a okazis en Nijmegen (Ned.) en 1922; 8. en Nürnberg 1923; 9. en Wien 1924; 10. en Paris 1925; 11. en Spaa (Belgujo) 1926; 12. en Assizio, fermita en Roma, Italujo, 1927; 13. en Tilburg (Nederlandoj) 1928; 14. en Praha 1929; 15. en Budapeŝt 1930. En 1931 ne okazis kongreso pro la grava politika krizo en Hispanujo, kie estis okazinta la 16-a kongreso. Tial nur okazis Ĝenerala Kunveno de la Estraro de IKUE en Eindhoven, samtempe kun la Jarkunveno de Ned. Katolika. La 16-a kongreso okazis en Lourdes 1932.

En tiuj kongresoj estis pritraktataj pluraj temoj, i. a. Unuiĝo de la Eklezioj (tial ankaŭ kelkaj nekatolikoj ĉeestis kongresojn de IKUE, ekz. la unuan kaj la duan), Uniformeco de la latina lingvo, Organizado materiala de la Eklezio, Socia katolika agado, Protektado de la junulinoj, Tutmonda ap-

ologia Asocio, E kaj la blinduloj, Katolikoj kaj la pacifismo, E kaj la elmigrado, Kontraŭ-alkohola movado, Int. rilatoj inter junuloj de diversaj landoj, Misioj katolikaj, Int. presagen-tejo, ktp.

IKUE havis ĝis nun 4 prezidantojn: la unua pastro Austin Richardson; la dua prez. estis pastro Patrick Parker (Irlando) elektita en Roma, 7 sept. 1913. Li akceptis por unu jaro. La 3-a prez. estis pastro Fr. Meštan, elektita en Nijmegen (Ned.) 22 aŭg. 1922. Dum tiu kongreso P. A. Schendeler estis provizore prez. Pro la Ika afero f-ino Larroche estis la ununura restinta ano de la Ĉefestraro; la aliaj estis eksigintaj. Tial f-ino Larroche estis nominta s-ron Schendeler kaj pastron Becker (Breslau) provizoraj estraranoj. Dum la Nimega Kongreso estis elektitaj por la Ĉefestraro: prez. pastro Meštan, Piaristo, Wien, vicprez. f-ino M. Larroche, Paris, 1-a sekr. P. A. Schendeler, 2-a sekr. Hookham, London. La 4-a prez. estas J. Font Giralt, de 1927.

Izolite laboris por E fervoraj katolikoj. Multnombre vizititaj E-tagoj okazis en Nederlando: Veghel, Tilburg, Breda kaj Oisterwijk; kiel ankaŭ en Franzensbad, kiuj konatigis E-n en pli vastaj rondoj.

Praktike uzadis E-n i. a. katolikaj misiistoj en Kanada, ekz. la redemptorista pastro J. M. Decoene, ĉe Brando, urbo en Manitoba ŝtato, kie li katekizis, prenis konfesojn, predikis, administris la sakramentojn al paroĥanoj el pli ol 17 malsamaj lingvoj per helpo de E.

Sammaniere faris pastro Jubinville en Saint Félix, Kanada, kaj aliaj Misiistoj en Ĥinujo. E-ista apostolo farigis frato Izidoro Clé. el la Kongregacio de la Fratoj de la Karitato, prof. ĉe la Reĝa Blindul-Instituto de Woluwe-Bruselo. Lian proponon, enkonduki E-n en la blindulejojn, la Napola Blindulara Kongreso (1909) aplaŭde aprobis je la ĝojo de Papo Pio X-a.

Sep oficialaj organoj en 1912 servis al la interesoj de la tutmonda Kat. E-istaro. L' Espérantiste Catholique, Germana Katoliko Kataluna Katoliko, Neder-

landa Katoliko, Belga Katoliko kaj Germana Katoliko por la Bavara, Saksa, kaj Okcidenta Ligoj, estis legataj en 43 diversaj landoj. La plej grava organo estis kaj ankoraŭ estas Espero Katolika, oficiala organo de IKUE, en kiu ĝi ludis kaj ludas gravan rolon.

En 1926 pastro Ramboux fondis la Societon »Sankta Miĥaelo« (SSM) kies celo estis kolekti monon por ebliigi la eldonadon de kat. literaturo. Precipe el Ned. pere de frato Wigbertus van Zon, SSM ricevis tiom da mono, ke ĝi povis aperigi la duan eldonon de Fabiola. Pastro Ramboux, kiu ĉiam volis antaŭen, eldonis ankoraŭ por la geknaboj La Etulon kaj por la skoltaj Skolta Heroldon. En 1930 EK eliris dusemajne kaj en pli bela eksterajo. En jan. 1931 ĝi farigis denove monata revuo, sed la abonantoj ricevis krome, la gravan kaj belaspektan de Ramboux redaktitan kaj eldonitan Katolika Vivo-n. Tamen baldaŭ pruvigis ke Ramboux estis tro taksinta siajn monrimedojn.

Spite de la riĉa donaco (10,000 francoj) de frato W. v. Zon kolektita inter la Ned. katolikoj, Ramboux devis rezigni la eldonadon de siaj karaj revuoj kaj gazeto. Tamen la kuraĝa kaj ĉiam optimista prez. de IKUE, Font Giralt, transprenis la laboron, kaj en jan. 1932. je sia persona respondeco, sen ia rilato kun la Ĉefestraro de IKUE, li reelirigis la monatan revuon Espero Katolika.

Interdume pluraj katolikaj verkoj estis aperintaj: La kvar Evangelioj; Respondoj al kontraŭreligiaj paroloj de Ségur; Fabiola; Kie estas la Eklezio de Kristo; Historio de Kristo de Papini; Floretoj de S. Francisko; Sankta Antonio; Pia Versaro de S. Alfonso; Infero de Dante; Pentroarto en la Malnova Hungarujo ktp. kaj ankaŭ kelkaj kat. preĝaroj.

Pli kaj pli la katolikoj interesigis pri E. precipe en Nederlando, kie la Kat. E-movado ĉiam estis tre vigla. La K. R. O. (Katolika Radio-Disaŭdigilo) Huizen, de 1930 konsentas al P. Heil-

ker, pritrakti ĉiusemajne la Skriban E-kurson de Nimego, al kiu ĉiujare partoprenas ĉ. 5000 personoj. Nederlanda Katoliko kune kun aliaj unuigoj starigis gazetarservon, direktoro por N. K. estas Frato W. van Zon, Resuse; Kat. E-Librejo fondiĝis ĉe W. van Eupen, Eindhoven; Kat. Informoficejo, kies korespondanto estas Fr. Monulfus, Papenhulst. Den Bosch. Ĉi tiu oficejo eldonas katolikajn apologiajn verkojn kaj sendas ilin al personoj, kiuj deziras konatiĝi kun la kat. Eklezio.

Flanke de la ĝenerala organizo Katolika, devas esti menciata Mondjurnalaro Katolika (MOKA), fondita en Hago 1920, samtempe kun IKA. MOKA eldonas dumonatan revuon La Juna Batalanto, kiu en 1929, ankaŭ fariĝis provizore la organo de la E-sekcio de IKA por anstataŭi Katolika Mondo-n, kiu, pro grava krizo, ne plu povis aperi.

La Int. Kat. E-Movado ĉiam ĝuis la aprobon kaj helpon de kat. altranguloj: la Papoj Pio X-a, Benedikto XV-a, Pio XI-a, Kardinalo van Rossum. Precipe Msro. Giesswein kaj Kardinalo Piffel komprenis la grandan utilon de E, ankaŭ Msro. Diepen de 's Hertogenbosch, en kies eparĥio troviĝas ne nur la sidejo de Nederlanda Katoliko, sed ankaŭ tiu de IKUE, plue en Nederlando la senatano P. De Jong van den Heuvel kaj d-ro Moller, parlamentano.

(Plejparte ĉerpita el *Espero Katolika kaj Nederlanda Katoliko.*) v. IKA, MOKA.

FRATO W. van ZON.

Katolika Preĝaro. De S. Radegonde, Latina kaj E-a teksto. Ĉiuj dimanĉaj diservoj kaj la plimulto de la festoj de 1^a jaro. 1908, 180 p.

Katolika Preĝlibro. De Carolfi. Latina kaj E-a teksto. 1922, 160 p.

Kauer Elmar, estono, laboristo. Nask. en Tartu. Partoprenis aktive la lab. movadon kiel kom. partiano ekde 1922. Pro organizo de junkomunistaj ĉeloj kaj batalaĉemantoj kondamnita al 15 jara punlaboro, sed post 1½ jaroj amnestiita. Gvidis multajn kursojn laŭ la Cseh-metodo en Tallinn. Red. de

la gazeto »Onto«. Prez. de E LEA kaj Tallinna LES.

Kawahara (kaŭahara) Jikichiro, japano, prof. de Tyuo Univ. Tokyo. Nask. 19 majo 1896 en Kanazawa-si. Studis politikan sciencen. J reprezentanto de int. kongreso de la asocioj de Ligo de Nacioj en Budapeŝt, 1931. Dir. de JEI. Vicprez. de 23-a UK. Verkis multajn E-lernolibrojn, ekz. *Komentario al Karlo. Vicĉefdel. de UEA.*

Kawasaki Naokazu, japano. Nask. 31 ja. 1902 en Osaka-si. Studis francan literaturon en Waseda Univ. E-isto de 1919; LK de 1933. Enkondukis en J-ujon diversajn teoriojn de eŭropaj E-gramatikistoj. Prilingvaj artikoloj kaj verkoj 119. Iniciatis en 1928 aranĝon de lekcionoj pri E-logio en JE Kongreso. En 1930 kun Okamoto eldonis gazeton E-logio (J). Lia ĉefverko »Kie estas amo, tie estas Dio«, 1930, estas detala komentario kaj unika »Bibliografio de la libroj, kiuj utilas por praktike studi E-n«; dua pligrandigita eldono en 1934. Kompilis: *Lit. Legolibro*, Franca Parto, 1934. Ĉefkunlaboranto de la *Enciklopedio*.

Kazi-Girej Nikolaj Aleksandroviĉ, ruso el Kaŭkazo, civila ĉefingenero en Ĉina Orienta Fervojo. Nask. 9 nov. 1866 en Petrograd, mortis 30 dec. 1917 en Farbin. Kunfondinto kaj prez. de Manĉuria ES. Trad. du rakontojn de Garŝin. 1896 kaj 1912. En 1902 li publikigis (en sep eŭropaj lingvoj kaj E) leteron pri E, adresitan al Geografia Societo en Antwerpen.

Kazoks (kajoks) Augusts, latvo, telegrafa inspektisto. Nask. 1880. E-isto de 1908. Estrarano de Latva ES 1925—32. Red. de *Ondo de Daugava* 1925—31. Prop-is E-n per gazetartikoloj. Unu el la plej eminentaj latvaj poemtradukistoj. Kunlaboranto de L. M.

Kazo post kiel. Post kiel la substantivo devas havi la saman kazon, kiun havas la vorto, al kiu ĝi rilatas. Ekzemploj:

1. Petro amas Paŭlon kiel vera amiko.

Li elektis nin kiel prezidanto.

2. Petro amas Paŭlon kiel veran amikon.

3. Ni elektis lin kiel prezidanton.

La ekzemplojn sub 1. oni povas kompletigi per la ripeto de P verbo:

Petro amas Paŭlon kiel vera amiko amas.

Li elektis nin kiel prezidanto elektas.

La ekzemplon sub 2. oni kompletigas per oni...as:

Petro amas Paŭlon kiel veran amikon oni amas.

La ekzemplon sub 3. oni kompletigas per por ke li estu...

Ni elektis lin por ke li estu prezidanto.

Anstataŭ la lasta kazo oni povas uzi simplan nominativon (predikativon):

Ni elektis lin prezidanto.

KALOCSAY.

Kearney (kerni) Elfric Leofwin, anglo, edukada ekzamenisto. Nask. 3/ aŭg. 1856 en Wimbledon, mortis 29 nov. 1913. Pioniro de E. Trad. Alicio en Mirlando de Carroll, 1910, 132 p.

Keating (kitin) Joao, brazilano, d-ro, prof. de franca lingvo en gimnazio de Campinas. Mortis. Estis vicprez. de BLE, prez. de la 1-a B. Kongreso de E. Unua prez. kaj kunfond. de EG en C.

KEF: Kataluna E-ista Federacio. v. Hispanujo.

KELI, Kristana E-ista Ligo Int. La protestanta (aŭ evangelia) E-movado estas organizita en KELI, kies anaro konsistas el anoj de la plej diversaj apartigoj de la prot. eklezio, ekz. de Luteranoj, Kalvinanoj, Metodistoj, Baptistoj, ktp. — La celo de KELI estas la enkonduko de E en la interrilatoj de tiuj int. misio-societoj, kiuj celas la disvastigon de la biblia evangelio de Jesuo Kristo. Oni klopodas atingi tiun ĉi celon per kolektado de anoj en ĉiu nacio kaj en ĉiuj prot. organizaĵoj, per eldonado de int. ligo-organo, per organiza subdivido en naciaj ligoj kaj lokaj grupoj, ktp. — La prot. E-movado komenciĝis en 1907, kiam barono von Starck, Genève, publikigis artikolojn pri E en germanaj prot. gazetoj. En febr. 1908 ing. Paul Hübner eldonis regule presitajn raportojn, kiuj en 1909 estis anstataŭitaj

per la E-a organo de la KAJV (Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj): Dia Regno. En la UK en 1911 la kunveno de prot. E-istoj decidis fondi prot. E-istan ligon kaj dum la UK en 1913 la fakkunsido konfirmis la plenan konstitucion de KELI, kies organo nun estis Dia Regno. Dum la milito KELI ĉesigis la agadon. Nur en la UK en 1928 la laboro denove komenciĝis. Per vigla kunlaboro la ligo en Nederlando denove travivis rapidan kreskadon. La centra oficejo estas en Germanujo; adreso: Paul Hübner, Pölkensstrasse 4, Quedlinburg. La oficejo de la nederlanda sekcio (NCEV) estas ĉe H. C. van Leeuwen, Wijke.

P. HUBNER.

Kelter H. firmo de l' preseo, kiu unua en la mondo akiris supersignojn kaj presigis la unuan broŝuron de L. I. de d-ro E, 1887. La presisto, kiu ankaŭ poste presigis multajn verkojn de Z, estis la filo de H. Kelter, Jakobo (1869—1922 en Varsovio), sed en 1887 li presigadis ankoraŭ ĉion ĉe sia patro, ĉe strato Nowolipie. La firmo J. Kelter ekzistas ankoraŭ nun ĉe Strato Rymska en V.

Kenelm Robinson — estas nomo, sub kiu aperis du novelaroj. *Se Greneto...* (1930), Vol. 2. (1931), kaj eta unuaktaĵo, *Homaranisma Laboro* (1931): en la posta jaro mortis la aŭtoro en London. Lia verkado ĝenerale apartenas al la sama skolo kiel tiu de K. R. C. Sturmer. Ambaŭ aŭtoroj psikologie lumigis kvietajn epizodojn el la societa aŭ individua vivo. Tamen ia Freudisma tendenco de K. R. emigis lin preferi seksajn temojn, kiujn li tiom diversguste tuŝis, ke liaj skizoj varias de lirika sentimentalismo (Apud Stacidomo Viktoria), kaj amara malvarmo (La Manio), ĝis kruda rikano (La Fivivo). Aplikante al ili aŭtoro lian propran sondilon, la psikologion, oni povas opini, ke tiaj kontrastoj indikas animan ŝanceliĝon post junaĝaj eltrovoj pri la ekstreme tereca bazo de multo, kion li iam kredis idealo. Verkante divershumore, li subjektive lumigis interesajn aspektojn de »la vero«. Lia plej serioza novelo, *La Fremda Knabo*, troviĝas en *Se*

Grenereto... Realece priskribante la vivon en iu angla pensionlernejo, ĝi versajne estas aŭtobiografia prezento de la medio, en kiu la aŭtoro travivis fruajn disreviĝojn. Se jes, ĝi havas ŝlosilan valoron koncerne liajn ceterajn verkojn. W. B. JOHNSON.

Kenn Won, ĉino, d-ro de beletristiko, univ. prof. Nask. 1900 en Canton. E-istiĝis antaŭ la milito. Studis en Lyon, Francujo. 1921. Delegito al: Int. Edukista Konferenco, Genève, 1922; Int. Komerca Konf., Venezia, 1923; Int. Radia Konf., Paris, 1925. Partoprenis la UK en Wien kaj Genève, 5 landajn kongresojn en Eŭropo. Membro kaj konsilato de ICK; LK. Preleganto de la Somera Univ. en Genève. Artikoloj en diversaj gazetoj. Dir. de E-Instituto en Canton, 1926. Gvidas la movadon en Canton kun Wu, Hsu, Sinpak k. a. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Kennngott Alfred, usonano, docento de franca lingvo en Univ. de Texas, de 1927. Nask. 14 apr. 1878 en Zürich, Svisujo. Aŭtoro de Ilustritaj Rakontetoj; Ĉiutaga Vivo; Usono; kaj lernolibro. Kolektis kaj aranĝis: Dialogaro; Int. Frazaro; Int. Teatraĵetaro; Int. Legolibro; kaj aliajn verkojn.

Kesik (kešik) Herold, hungaro, oficisto de la urbo Bratislava (Ĉeĥoslovakujo). Nask. 2 jan. 1888 en Solyvár (Hungarujo). E-isto de 1919. UEA ĈD-Helpanto. Instruis oficiale E-n en burĝa knabina lernejo 1925—1930.

Kéthelyi (ketheji) E. István, hungaro, aerĉefinspektoro; antaŭmilita nomo: Krausz. Nask. 24 febr. 1889 en Kassa. E-isto de 1908 dum sia soldata servo en Wien. De 1909—1912 fervore laboris en Pozsony (Bratislava). En 1918 kunfondinto de H E-isto. En 1922 gvidis la unuan oficialan kurson ĉe la hungara polico.

KEU, Komercesta E-Unio. Fondis: okt. 1922 sub nomo E Komercesta Grupo W. Ranft, bankoficisto en Dresden. Celo: enkonduko de E en komercon kaj industrion per la apliko praktika de E en la komercado mem. La unua tasko estis, proponi la servojn de KEU al la E-istoj, por havi

interesatojn por plej diversaj varoj. Post kiam tio estis sukcese farita, oni sin turnis al fabrikoj, transdoninta la ofertpetojn kaj mendojn skribitajn en E. Konvinkite per tiaj praktikaj sugestoj, multaj firmoj ekuzadis E-n en la korespondado, aperigis diversajn reklamilojn, mendis anoncon en la ofertbulteno de KEU La Komerc (aperanta 3—4 foje jare). KEU faris propagandon precipe por germanaj varoj. Adreso: Dresden-Radebeul, Friedrich August Str. 4.

Kial venkis Esperanto? E ankoraŭ ne estas ĝenerale rekonita kaj oficiale akceptita, tamen oni povas jam paroli pri ĝia venko, ĉar ĝi estas praktike elprovita kaj uzata, ĝi pruvis sin taŭga por la rolo de int. lingvo, ĝi estas vivanta, dum ĝiaj rivaloj mortis antaŭ ol vere ekvivi. La kaŭzoj de ĉi tiu venko estas multaj, jen la ĉefaj el ili.

1. E frue venkis la internajn reformmovadojn, el lingvo diskutata ĝi frue iĝis lingvo uzata. »Ni fosu nian sulkon!« La E-istoj ekfosis anstataŭ disputi pri P fosilo. E, kiel ĉiu alia lingvoprojekto komence altiris amason da amatoraj lingvistoj, kiuj sur la kampo de int. lingvo intencis travivi siajn inklinojn. Kiam la reformmovado estis subpremita, ĉi tiuj parte ekŝiĝis por feliĉigi aliajn lingvoprojektojn, parte submetis sin al la plimulto, kaj donis sin al praktika laborado. La restintan parton obstinan la Ido-skismo forbalais el la movado.

2. En la tempo, kiam la praktika uezblo de E estis ankoraŭ nula, tre grava estis la helpo de puraj idealistoj. Ĉi tiujn altiris la »interna ideo«, kiu ja ne estis oficiale prononcita, sed kies fidela reprezentanto estis la lingvoaŭtoro mem. Ĉi tiu idealisma flanko mankis ĉe aliaj lingvoprojektoj: tiuj akcentis nur la praktikajn avantaĝojn de la int. lingvo, do altiris nur la danĝerajn lingvist-amatorojn, ĉar praktikan utilon doni ili ne povis, sekve la praktikuloj preferis atendi.

3. Diference de ĉiuj aliaj projektoj, E elektis kiel ĉefan agadkampon la literaturon. Aliaj projektoj klopodis kapti unuavice la sciencajn rondojn. Sed estas evidente, ke ĉe komenco de

lingva movado mankas materialaj rimedoj por eldoni gravajn, reprezentajn sciencajn verkojn, do int. lingvo en scienculoj absorbitaj de sia propra fako povas veki nur surfacan kaj efemeran interesigon. Male, la literaturo estas komuninteresa, povas altiri vastajn rondojn, ebligas eldoni komence malgrandajn librojn (do ne necesas granda kapitalo kaj risko), kaj poste, post la eduko de P' legantaro per varbforto al inteligentaj larĝaj socitavoloj povas aperi iom post iom pli ampleksaj, pli altnivelaĵoj verkoj, dum la simplulojn servas libroj simplaj kaj facilaj. Krome, la literaturo grave efikas al la evoluo de la lingvo, kaj al E vere la literaturo donis la propran spiriton, ĝi faris ĝin lingvo vivanta. Ĉi tiun gravecon de la literaturo rekonis ankaŭ la E-istoj mem, kiam ili festas. laŭ la propono de Baghy, la 15-an de decembro kiel la Tagon de Libro.

Lastatempe aŭdiĝas riproĉaj voĉoj kontraŭ la literaturo en E. Oni diras, ke la literaturo ne povas esti tasko de int. lingvo. Nu, oni povas respondi: E ne estu malfidela al la literaturo, ĉar propre al la literaturo ĝi dankas sian vivon. TOTSCHÉ.

... kiel kaj kiamaniere E sukcesis superi multnombron da similaj, ankaŭ aposterioraj kaj relative ankaŭ bonaj, lingvo-projektoj?

Por tion kompreni, ni notu ankoraŭ pliajn favorajn faktorojn por plua disvastiĝo de E:

1. Z, estante mem produkto de politike kaj nacie premita regiono de la rusa Polujo, kvazaŭ koncentris en sia rusa menso la tutan energion kaj persiston, pri kiu nur povis revii la minoritata loĝanto de la iama rusa imperio. Tiun energion li uzis por efektiviĝi sian, laŭ li tre gravan — socian laboron, celantan egalecigon de la nacioj. Tiu energio kaj persisto kaŭzis, ke Z, ne laciĝante, fordonis dum jaroj sian tempon kaj monon por propagandi la novan lingvon kaj ĝin diskonigi. Tion li faris eĉ dum la krizaj momentoj, kiam la movado ŝajne malkreskis kaj kiam al ĝi ŝajne minacis pereco.

2. Ĉe Z estis en intima kunvivado certa idealismo kun altgrada prakti-

kismo rilate al la penadoj efektiviĝi sian revon. Tial tre lerte kaj antaŭvideme li aranĝis la propagandadon de E eldonante la lernolibrojn samtempe en ĉiuj plej gravaj eŭropaj lingvoj kaj malavare dissendante ilin tra la tuta terglobo.

3. E aperis en Rusujo — lando ideologie tre favora por la propagando de E-ismo, en lando ĝis tiutempe neniigrade tuŝita de la ĝenerala mondlingva propagando kaj ankaŭ en relative malgranda grado tuŝita de la propagando de Volapük, kie propagando de Volapük estis krom tio ofte ĝenata. Por E en Rusujo, almenaŭ dum la unuaj 7 jaroj, tiaj ĝenoj ne ekzistis. Rezulte, dum nuraj 2 jaroj post apero de la unua libro, en Rusujo jam estis varbitaj 1000 E-istoj — nombro sufiĉa por ke la lingvo int. ekkresku.

4. La momento, kiam aperis E kaj kiam ĝi komencis fariĝi konata en la mondo, kiel plene uzebla lingvo int., — tiu momento koincidis kun la periodo, kiam en Volapük-movado okazis plej gravaj bataloj, kiam plej akre kreskis la opozicio kontraŭ la lingva aŭtokrateco de Schleyer. Z, male al Schleyer, deklaris, ke la int. lingvo estas nenies propraĵo, kaj li mem rifuzis ĉiujn rajtojn de la lingvo-aŭtoro. Aldone Z en tiu kriza por Volapük periodo plej klare kontraŭmetis al la arbitro de la Volapük-konstruo principon de eltrovo de la internaci-lingvaj elementoj el la elementoj de la moderna eŭropa lingvaro. Pro tiuj du kaŭzoj certa nombro da opoziciantaj kaj malkontentaj volapükistoj, . . . venis tuj de P' komenco al E kaj kvazaŭ aranĝis ian fizikan lignon inter la vast-kreskinta Volapük-movado kaj la nova movado E-ista.

(Prenita el Historio de Mondolingvo, p: 180.) DREZEN

Prof. D. Jirkov (Ruslando) dediĉis apartan studon pri la temo kun sama titolo (1931, 40 p.). »La ĉefa afero, en kiu Jirkov tute prave vidas ateston pri absoluta plifirmigo de E kaj pri ĝia venko, estas la preterigo de la interna krizo de la jaro 1908, ligita kun la reformema tendenco, konata sub la nomo Ido, kaj ankaŭ

la klasa displitiĝo de la movado E-ista post la mondmilito. Efektive, tiuj ĉi du faktoj difinas ne nur stabilecon de E kaj ĝian vivkapablon, fortikiĝintan pro la preskaŭ duoncentjara batalado por ĝia ekzisto, sed ankaŭ ĝian internan forton potencialan, kiu ebligas kun plena konvinko paroli pri neevitebla definitiva venko de E. (El la Antaŭparolo.)

Kiboŝa. Morala societo, havinta pli ol unu milionon da anoj en Japanujo, nun disigita, ĝia gvidanto, S. Gotoo, troviĝis en malliberejo. Ĉu la disfalo kaj malliberigo okazis pro politikaj motivoj aŭ pro efektivaj krimoj, tion la redakcio ne povis konstati fideble. v. Nipono.

Kidosaki Masutosi, japano, bankisto. Nask. 24. apr. 1907 en Hukuokasi, kaj tie laboris multe por E. Verk-oj: E-a Frazaro, 1929, Z-a Legolibro, 1931. Edziĝis al bela riĉega E-istino, f-ino Owada-Hinako.

Kie estas la eklezio de Kristo. De v. d. Hagen, S. J., el la nederlanda trad. f-ino M. Borret, 1912, 160 p. Kun eklezia aprobo. Tre disvastigita verko en Ned. Vere ora libreto por ĉiuj, kiuj senpartie deziras ekoni la katolikan eklezion. W. v. ZON.

Kiel fariĝi Poeto. v. Parnasa Gvidlibro.

Kiel fariĝis nia movado? Artikolo de Stojan en la UEA-jarlibro 1928, p. 72—91. Tabela historio pri la komenco de la E-movado en ĉiuj partoj de la mondo, mondro de la unuaj pioniroj, grupoj, societoj kaj gazetoj. »Kiel unua provo de tia speco, la tabelo neeviteble havas kelkajn erarojn kaj mankojn, korekteblajn nur per kolektiva kunhelpo.«

Kiel Plaĉas al Vi. De Shakespeare, teatraĵo de la 6-a UK, el la angla trad. Ivy Kellerman. 1910, 137 p.

Kifermann Mikaelo. v. Gabrielo.

Kihlberg (ĉilberj) Hjalmar, svedo, popollerneja instr. en Vingaker. Nask. 1 jan. 1881 en Kilanda. E-isto de 1928. Prop. kaj kursgvidado. Artikoloj.

Kijomi Rokuro (-roo), japano, verk-isto. Nask. 11 okt. 1886 en Tōkyō-si. E-isto de 1922. J-a traduko de »Mar-ta« el E, 1927. — (Kaw.)

Kikauka (kijlkajūka) Peteris (ps. P.

Kikau), latvo, prof. de la greka lingvo ĉe Univ. en Riga. Nask. 28 nov. 1886 en Miĥanoviĉi. E-isto de 1907. Trad. latven L a E s p e r o kaj novelon el latva lingvo: J. Poruks — V a k c i n i u j a k r o n o, 1909.

Kilian Teodor, ĉeĥo, ŝtata instru-isto ĉe Komerca Akademio en Trebiĉ. Nask. 26 sept. 1894 en Ivanĉice. Gvidis pli ol 20 E-kursojn, ankaŭ el radio-Brno en 1932—33, kiun sekvis vico de Radio-kurso el Brno ankaŭ en 1934/35. E-lingvaj prelegoj pri diversaj temoj. Verkis lernolibron en 1933.

Kim Verda E., koreo, redaktoro. Nask. 30 nov. 1893 en Pjeng-An, Koreujo. Verkis elementajn instrulibrojn, tradukis koreajn rakontojn. Kunlabo-ranto de la Enciklopedio.

Kimel S., rumano, kuracisto. Nask. en 1875, mortis en 1930. E-iĝis en 1907. Kunfondinto de RES, gvidis la unuan publikan kurson en Bucureŝti, 1907, verkis la unuan rumanan lerno-libron, 1908.

King Johano Lowe, novzelandano, Mortis 25 sept. 1927 en Auckland. Precipe multe laboris por E en Gisborne, kie li starigis kaj instruis E-klason, disaŭdigis per la loka radiostacio kaj estis del. de UEA. S.

Kio estas Oomoto? 5-a eld. 1933, 96 p. kun ilustraĵoj. Enhavo: Ajabe, Kameoka, La profetino, Majstro Deguci, Mirakla epizodo, Granda profeto, Kio estas O, Ĉefinstruo de O, Karakterizaj trajtoj de O-Instruo, Praktika agado de O, Statistiko de O-Movado, sept. 1933.

Kiss (kiŝ) János, hungaro, d-ro, univ. prof. de la kristana filozofio, papa prelado. Nask. 1857 en Szeged, mortis 13 aŭg. 1930 en Spaa (Belgujo.) Eminentulo en sia fako. Estis fervora E-isto. En 1913 parolado por E dum la int. kongreso de la libroeld-onistoj. Artikoloj.

Kitzler Leopold, germano jugoslav-ujaj, privata oficisto en Maribor. Red. en 1928 de K o n k o r d o, trad. germanajn beletristikaĵojn, gvidas kursojn, faras propagandon.

Kizaki Horisi, japano, adv., eks-membro de prefektura deputitaro de Tōkyō. Nask. 18 okt. 1899 en Mien-ken. E-isto de 1919. Estis dir. de

JEI, iniciatis kolekton de fundamenta kapitalo por ĝi. — (Kuw.)

KKK: Konstanta Komitato de l' Kongresoj, v. Kongresoj.

Klajić Rad., serbo, financa inspektoro pens. en Beograd. Nask. en 1876. Persista prop-isto, verkis lernolibron en 1910, estas prez. de ES Beograd, del. de UEA. Prez. de 5-a jugoslava E-kongreso.

Klara lingvo. Esprimo uzata en telegrafaj rilatoj. Estas kodaj lingvoj, por kiuj oni devas pagi telegramojn laŭ nombro de literoj kaj klaraj lingvoj, por kiuj oni pagas laŭ nombro de vortoj. En okt. 1925 la Univ. Telegrafa Unio deklaris E-n klara lingvo. v. PTT. (l. Privat, Hist. II. p: 171.)

Klari. Religia romano de M. Catalan y, el la franca trad. E. Robert. 1926, 136 p. »La celo, montri neceson de religiaj sentoj, ne tro trudigas. Bone tradukita.« (G. S., »E' 1929, p: 9.)

Klečka Karel, aŭstro-ĉeĥo, d-ro, pens. policoficisto, »kortega konsilanto.« Nask. 1. jul. 1864. Laboris diversmaniere por E, estis prez. de AED kaj de Bohema EK en Wien. Nun prez. de EG »Fideleco,« kiu ĵus festis sian 25-an fondiĝaron. Verkas en E.

Klein (klajn) Alfred, hungaro, komercisto. Naskiĝis 15 aprilo 1900 en Miskolc (Hung.) Ellernis E-n en 1921 en Miskolc, daŭrigis la E-an laboron en Freiberg i. S. De 1923 agadas en la veniaj E-aj grupoj, precipe en Danubio. Estis estrarano de AED, ktp. Kunfond. kaj gvidanto de la EG de la Naturamikoj. Artikoloj en HDE. La Socialistoj kaj Sennaciulo, precipe pri naturamika movado.

Klemm Moritz, germano, emerita supera instr. Nask. 18 jul. 1859 en Gahlenz. Specialisto de instruado de infanoj en la unuaj klasoj, por kio li kreis specialan metodon kaj aparatojn por legi, skribi, kalkuli. Antaŭbatalanto por plimsimpligo de la Ortografio. E kursoj laŭ propra metodo; gazetartikoloj. Mondenketo pere de »Chemnitzer Tageblatt«, 1928.

Klerk Kees de, nederlandano, stratpurigisto. Nask. 29 jan. 1886 en Bennebroek. Aktiva sindikatisto, kaj ad-

epto de anarĥiista idealo, kontraŭmilitismo. De 1926 seninterrompe gvidis kursojn, precipe konversacion. Paroladoj kaj artikoloj.

Kliem (klim) Karl (ps. Koko), germano, ŝtata imposta oficisto. Nask. 27 marto 1888 en Winzig. E-isto de 1920. Stariginto de la Z monumento en Bad Reinerz, inaŭgurita 16 aŭg. 1931. Kunfondinto de Silezia Ligo E-ista (Sileo). Estro por propagando kaj gazetservo en GEA. Prop. artikoloj en komercaj fremdultrafikaj gazetoj. Eldonis gvidilojn. Originala teatraĵo duakta: Rapidu nur kun paŭzo, parte german- kaj E lingve, ofte ludita.

Kliemke (klimke) Ernst, (ps. Heinrich Nienkamp) germano, d-ro jura, ĉefoficisto ĉe »Deutsche Bank« Nask. 2 jan. 1870, mortis 20 febr. 1929 en Frankfurt am M. Multajn jarojn vojaĝis en Orienta Afriko, parolis kun la indiĝenoj en ilia lingvo. Pacifisto kaj adepto de Bahaismo. Estis prez. de GEA. Verkis du interesajn verkojn en G lingvo pri E. (l. E., 1929, p:86.)

Klimas A., litovo. E-isto de 1910. Laboris ĉefe en la suda landparto, distriktoj Mariapole kaj Kalvarija. Verkis lernolibron, 1921, kunlaboris al Litova Almanako.

Klingenberg B. Johs., norvego, infanteria kapitano, pacifisto. Mortis 28 apr. 1920. E-isto de 1911. Prez. de EK en Oslo 1912. Estrarano de NEL 1912—13. Verkis kaj eldonigis kelkajn E-ajojn, precipe kun pacifista enhavo, en la gazeto Intermita Sciigo, 1912—17.

Kloek (kluk), Adriaan, nederlandano, pandisportisto. Nask. 7. majo 1888 en Enkhuizen. E-isto jam antaŭ 1914, kiam li por kaj per E kunlaboris en laboristaj gazetoj. Red. de Nederland-E, poste Holanda E-isto 1920—31, sekr. de la Ned. Fed. de Laboristaj E-istoj 1920—28, red. ties Interembran Informilon 1922—25, verkis broŝurojn.

Knock, aŭ La Triumfo de Medicino. Komedio en tri aktoj, verkis J. Romains, el la franca trad. P. Corret, 1932, 80 p., ludita dum la 24-a UK. »Temas pri unu malnovmoda kaj unu modernega kuracistoj; ili trompas unu la alian, sed la nova,

Knock, sukcesas. La traduko estas tute klasika, ortodoksa. (G. S., 'E', 1932, p. 165.)

Kobajaŝi Mokiĉi, japano, desegnisto de Militipsa Konstruejo. Nask. 1899 en Yokosuka, mortis 23 okt. 1919. Ekstudis E-n 15-jaraĝa. Sindona laboranto en Y. post foriro de Osaka. — (Kaw.)

Kobajaŝi Tomeki, japano, estro de Kihoku Gissen Knabina Liceo, en kiu E estas instruata oficiale. Nask. 26 sept. 1897 en Sendai. — (Kaw.)

Koch (kofi) Anatolo, (ps. Ako), ukrainano, eksparlamentano ruslanda. Nask. 16 jul. 1887 en Zinkiv, Ukr. E-isto de 25 jaroj, Del. de UEA en Luck, Polujo, dumviva membro de UEA. Kunlaboris en O n d o d e E, J u n a E-isto k. a. Aparte eld. *De z i r o d e D i a k o n o*, de S. Mardas, trad. el la ukraina.

Kofman A., ruso, librotenisto en Odessa (Rusujo), estis unu el eminentaj E-poetoj kaj artradukistoj de la unua periodo (1892—1906). Li verkis originale poemojn kaj tradukis la dramon *K a i n de Byron*, parton de *I l i a d o* kaj partojn el *F a u s t* de Goethe. La unuaj du aperis en libroformo, la lasta troviĝas en malnova jarkolekto de L. I. Liaj stilo kaj tradukmaniero distingiĝas per arta simpleco kaj viva klareco. Lia pionira laboro meritas atenton de la posteuloj. En la komenca periodo de la literatura lingvo li vekis admiron per sia esprimkapableco. En 1896 li planis aperigi poemaron, tradukitan de li el 18 lingvoj. La reformema ondo lin forportis en la tendaron de la idistoj, (poste li iĝis Occidentalisto), tamen liaj postlasitaj verkoj kaj tiama lingvo-kulturado restas rimarkindaj.

J. BAGHY

Koivu (kojvu) Johan Isak, finno, instr. Nask. 19 dec. 1882 en Paavola. Komunuma agado en la hejmurbo Viipuri. Fervora agado por E en instr. kaj lab. rondoj. Multaj kursoj.

Kókai Ludoviko, E-a librejo. La unua librovendejo en Hungarujo, kiu apogis la disvastigon de E. La bonfamo de la firmo multe helpis al la E-ista afero. La librovendejo (Budapest, Kamer Mayer Károly-utca 3.) es-

tis ofte renkonteja de la ĉefurbaj kaj provincaj E-istoj. La firmo aranĝis en 1911 lit. konkurson. Ĝi eldonis diversajn gramatikojn kaj vortarojn, sciencajn verkojn de Vörös, multajn propagandilojn, glumarkojn, insignojn ktp. La nuna posedanto estas Rezső Kókai.

Kókai Rezső, hungaro, posedanto de librovendejo. Nask. 1879 en Budapest. Dum multaj jaroj komitatano de HES. Faris multon por la disvastigo de E pere de sia firmo, kolektis la E-librojn aperintajn en Hungarujo kaj eldonis listojn pri ili.

Kökény (kökenj) Lajos, hungaro, parlamenta stenografo (antaŭe ĵurnalista kaj mezlerneja prof.). Nask. 31 majo 1897 en Sátoraljauhely. E-isto de 1919. Fond. en 1928 H. Heroldo, red. kaj eld. ĝin ĝis 1930. Verkis propr. broŝuron 1928. De 1930 aperigis kvar kajorojn de E-Jarlibro H-lingve. Aranĝis lit. vesperojn, ankaŭ en la Muzik-akademio, organizis skribenketon pri E, 1931. De 1932 afergvid. vicprez. de HES. Inicitis (1932) kaj gvidas la ekzamenan komitaton. Alfaris la Radnai-stenografion al E, 1928 kaj samjare faris E-paroladojn dum la int. kongreso de stenografoj en Budapest. Laŭ komisiono de sia oficejo li interrilatas pere de E kun la parencaj oficejoj de la mondo por fondo de kolektoj pri dokumentoj de la parl. stenografoj. Laboris por E ankaŭ en la Paneŭropa movado. Diversaj artikoloj, ankaŭ en tri H. Enciklopedioj pri E. Redaktoro de la *Enciklopedio*.

Kolar Fran, kroato, financa konsilanto. 1877—1927. Pioniro, fondis en Bjelovar 1906 la unuan E-grupon en Kroatujo. Trad. en 1911 la historian romanon *La Trezoro de l' oraĵo* de A. Senoa.

Kolektado. La kolekta instinkto kunnaskiĝas kun kelkaj homoj. Oni kolektas la plej diversajn aĵojn. El kulturhistoria vidpunkto estas grava la kolekto de bildoj, libroj, gazetoj, presajoj, landkartoj, statuoj, bestoj, floroj, armiloj, roboj, monoj, porcelanoj, komunikiloj, ktp. Sed estas kolektataj ankaŭ la plej diversaj objektoj, kies kolekto unuavide ŝajnas sen-senca, kiel bastonoj, tabakujoj, pantofloj, perukoj, ŝlosiloj, amuletoj, glu-

markoj, poŝtkartoj, poŝtmarkoj, tramvojbilettoj, alumetskatoloj, ktp., sed ili per la kolekto akiras gravecon. La kolektantoj sentas plej forte la necescon de LI, ĉar por la kolekto oni bezonas tutmondajn interrilatojn. Inter la E-istoj estis ĉiam multaj kolektantoj. Ekzistis jam diversaj efemeraj E kolektantaj societoj, kluboj kaj gazetoj, ankaŭ UEA havis antaŭ la mondmilito kolekto fakon, sed ĉiuj tiuj ĉesis. En jan. 1932 fondiĝis »Tutmonda Asocio Kolektanta« (TAK), kiu jam havas 140 anojn en 14 landoj, ankaŭ propran gazeton: Tutmonda Kolektanto, eldonatan en Jablonné n. Orf. (Ĉeĥosl.) Prez. estas d-ro Jozefo Takács, Nagymaros, (Hung.), vicprez. F. Schreiberreiter, Wien, VII. Hermannng. 31/26. Kasisto F. V. Mizera, Jablonné, n. O. J. TAKÁCS.

Kolekto aprobita de d-ro Zamenhof. En 1901 Z, dank' al perado de Beaufront, subskribis kontrakton kun granda eldonfirma Hachette (v.) en Paris pri eldono de la kolekto. Ĝi enhavis verkojn nur ekzamenitajn de Z mem kaj la firmo ricevis ekskluzivan monopolon por eldono de ili. Tiamaniere estis garantiita apero de vere bonaj, rekomenditaj verkoj E-aj. Sed baldaŭ la firmo pretendis, ke ĝi sola havas la rajton eldonadi E-verkojn, kio ne trovis ĝeneralan konsenton. Z mem en 1905 ĉesigis la »kolekton aprobitan« kaj de tiam la firmo eldonis nur liajn proprajn verkojn. En tiu ĉi modera serio aperis lernolibroj kaj vortaroj por francoj kaj multaj lit. verkoj (E-aj Prozaĵoj; Hamleto, Fund. Krestomatio; Elektitaj Fabloj k. a.).

I. SİRJAĒV.

Kolev Panajot, bulgaro, liberprofesiulo. Nask. en 1892 en Sofia, loĝas samloke. Gvidis multajn kursojn. Unua lektoro de E en la ŝtata blindula instituto en Sofia. Organizis la laboristan E-movadon en B.

Köln. (Kolonjo). Urbo en Germanujo sur ambaŭ bordoj de la Rejno; 740.000 loĝantoj. 25-a UK 29 jul.—5 aŭg. 1933; la kongreson antaŭis gravaj malfaciloj pro la tiamaj politikaj ŝanĝoj; okazis interkonsento pri la organizo. Tie aperas la grava E-a gazeto HDE.

Kolobaŝkin K. M., ruso, ortodoksa pastro. Nask. 20 dec. 1892 en vilaĝo Nataljevka (Orel). E-n li ellernis dum junula aĝo. Li kunlaboris je Literatura, Espero Katolika kaj HDE. (»Leteroj el USSR«). Faris diservojn en E.

Kolombio, Suda Ameriko. Supozeble la unuaj E-istoj troviĝis tie en 1904—05. En 1909 la movado estas sufiĉe forta: tiam ekzistis E grupoj en Cucuta, Altamira kaj Bucaramanga, en la unua aperis la gazeto K-a Stelo, la prop-on kaj kursojn gvidis d-ro Abel de Rico. Laŭ UEA-1928 pioniro estis en 1909 ankaŭ San José de Cucula. Poste la grupoj unuigis en Ligon de K-aj E-istoj, kiun en 1911 akceptis sub sian patronadon la respubliko prez. Laŭ la Dietterle-statistiko 1928 E-istoj ekzistis en 7 lokoj. »K-a E Asocio estas definitive fondita.« (ICK-raporto 1931) UEA-del. en 1933 en Sogamoso. I. SİRJAĒV.

Kolportista Asocio, v. Interniario.

Komerca konferenco en Venezia, v. Italujo kaj Komerco.

Komercista Esperanto-Unio: KEU. (v.)

Komerco. Helplingvo ĉie uzata estus faciligo por korespondo, por eldono de prospektoj, reklamoj, ĝi signifus ŝparon kaj raciigon. Tamen ĝuste pro tio, ke la relative malgranda disvastiĝo de E ne promesis sufiĉe da profito, la komerca mondo nur hezitante kaj iom post iom provis ekuzi E-n. La ĉefa uzadkampo estis la reklamado en E gazetoj kaj per prospektoj, precipe por varoj, kiuj interesas ĉiujn homojn. Eldonaĵoj por specialaĵoj kaj por certaj branĉoj ne povis trovi intereson sufiĉan. La plimulto de tiaj reklamoj ne havis grandan efikon, krom tio, ke la E-istoj fiere montris ilin kaj uzis ilin ĉe ekspozicioj por pruvi la praktikan uzon. Nur kelkaj amasartikloj ricevis acetantojn per la E-a reklamo kaj nur en limigita nombro oni sukcesis tari negocojn per E-a korespondado.

Jam antaŭmilito oni rekomendis, ke la komercistoj simile, kiel ili surpresas sur la leterpapon la telefonnumeron, telegramkodon, surprisu »Oni korespondas Esperante«, por ke alilandanoj vidu la uzon. Malmultaj E-emiaj fir-

moj faris tion, sed la efiko estis ĉefe propaganda. Tamen kelkajn tiajn korespondojn oni ĝoje priskribis en la E-aj gazetoj.

Komercaj ĉambroj kaj konferencoj. Jam ia »Kongreso por Int. Ekonomio« en 1905 en Mons esprimis la deziron, ke E estu instruata en lernejoj. — La unua komerca ĉambro, kiu oficiale helpis E-n, estis la Londona, kiu deklaris sin favora en 1905 kaj jam en 1906 aranĝis publikajn ekzamenojn en E kaj daŭrigis ilin ankaŭ poste. Tiuj ekzamenoj daŭris ĝis ĉ. 1930, kiam eĉ pli grava aŭtoritato, la »Royal Society of Arts« decidis aranĝi la E-ekzamenojn. — La dua komerca ĉambro, kiu demonstraciis antaŭ la mondo sian favoron, estis tiu de Los Angeles, kiu en 1912 sendis tra la mondo *Parish* (v.). Li vizitis 19 landojn kaj faris paroladojn pri sia patrujo. Tiu ĉi ĉambro eldonis 64 paĝan gvidlibron pri Kalifornio, bele ilustritan. Ĝis 1914 51 francaj, 3 anglaj, 7 germanaj, 1 hispana, kaj 1 usona komercaj ĉambroj deklaris sin por E. — La kongreso de la komercaj ĉambroj en Madrid rekomendis la instruadon de E. — En 1917 la Londona Komerca Ĉambro presigis 1000 e-rojn de la broŝuro »A Common Commercial Language«. La Brita komitato pri komuna komerca lingvo, — fondita en 1917 — eldonis pluajn 9000 e-rojn. Samjare ĝi organizis paroladojn en britaj urboj.

Post la milito *André Baudet* (v.) atingis ĉe la Pariza Komerca ĉambro, ke tiu gvidu la propagandon inter la komercaj ĉambroj kaj per ili inter la komercistaro. Li submetis al la kunsido de la ĉambro 9 febr. 1921 plenan raporton pri E, ĝiaj konkurantoj, ĝia disvastiĝo, kaj ankaŭ rezolucion, laŭ kiu la ĉambro rekonas la gravecon de E, enkondukas ĝin fakultative en sian propran komercan lernejon kaj rekomendas ĝin al la komercaj ĉambroj de la mondo. La kunsido akceptis la rezolucion kaj la tuta teksto de la raporto estis aldonita al la raporto de la Ligo de la Nacioj.

La saman raporton prezentis *Baudet* en 1923 dum pasko en *Venezia* ĉe la Int. Konferenco por Ko-

merca *Helplingvo*, kunvokita per la Itala-Svisa Komerca Ĉambro, *Genève*, kaj sub protekto de itala ministro de l' *Industrio kaj komerco*. La konferenco, ĉe kiu reprezentigis sin (preskaŭ nur per konataj E-istoj) 90 komercaj ĉambroj, 8 ministerioj de komerco, 21 foiroj, 61 komercaj institutoj entute el 27 landoj de 5 kontinentoj, uzis E-n, kiel konferencan lingvon, akceptis similan rezolucion, kiel la Pariza Ĉambro kaj akceptis rekomendajn rezoluciojn pri foira, radia kaj turisma uzado de E. Kiel modelon, oni prezentis la parizan komercan jarlibron de »*Bottin*«, kiu enhavis apartan signon ĉe la nomoj de komercistoj, kiuj uzas E-n. La konferenco estis kunligita kun oficialaj vizitoj ĉe estraroj, institucioj, akceptoj ktp. La Komerca Ĉambro Itala por Svisujo en *Genève* eldonis en kelkaj lingvoj, ankaŭ en E, la protokolon de la konferenco, kiun oni dissendis al ĉiuj ĉambroj.

La *ICK* kun la franca societo »*E et Commerce*« kaj la Pariza Komerca Ĉambro aranĝis duan komercan *Konferencon* dum majo 1925 okaze de la Foiro en *Paris*. La ĉambro mem invitis kaj subvenciis. Reprezentigis sin 155 ĉambroj kaj 100 aliaj komercaj organizadoj. La malferma kunsido okazis kune kun la samtempa int. scienca konferenco en la halego de la Universitato (*Sorbonne*), kiun ĉeestis 200 personoj. Parolis famaj scienculoj kaj reprezentantoj de registaroj. La kunsidon disaŭdigis pariza radiostacio. La laboro de la konferenco mem ne estis grava.

Laŭ iniciato de *ICK* la direkcio de la Int. Foiro de *Frankfurt a. M.* kaj la Organiza Oficejo de la urbo invitis por pasko 1929 int. konferencon por turismo kaj rek-lamo. La organizan laboron plenumis *Robert Kreuz*. Venis gravaj parolistoj (ne E-istoj), sed E estis la oficiala traduka lingvo. Reprezentigis sin 86 korporacioj el 14 landoj, inter ili 15 pere de ne E-istoj. Ankaŭ tiu ĉi konferenco akceptis favorajn proponojn rilate E-n, tamen la oficialaj int. komercaj reklamoficejoj ne okupiĝis plu pri E pro manko de taŭgaj personoj,

kiuj estus daŭrigantaj la laboron en tiu medio.

La prez.-oj de la komercaj ĉambroj de Francujo kaj Alĝerio en 1931 adoptis deziresprimon pri la utileco de E. La komerca ĉambro en Sheffield organizis klason por lernado de E en 1931.

Ministerioj, instruado. La rusa cara ministerio por komerco kaj industrio sendis Nedošivin kiel delegiton al la UK en Antwerpen en 1911. Pri tio la ministerio aperigis ampleksan raporton ruslingve kaj en 1913 pagis subvencion por E-a komerca oficejo en Petrograd. — Poste ankaŭ aliaj ministerioj reprezentigis sin ĉe la konferencoj por komerca lingvo kaj ĉe UK-oj. — La nederlanda ministerio de publika instruado eldonis 2 febr. 1931 dekreton N-ro 41.241., laŭ kiu E povas esti fakultative instruata en komercaj lernejoj kaj kursoj. Tiuj kursoj povas ĝui ŝtatan subvencion laŭ pli frua tiurilata dekreto.

La fama katalogo de Davidov (v.) jam en 1911 enhavis la nomojn de 6 lernolibroj por komercistoj. La unua aperis en 1903 ĉe Hachette, Paris, Komercaj leteroj de Berthelot kaj Lambert. Grava estis la E-a eldono de O'Connora komerca korespondaro, eld. en 1907 de Guilbert. Pitman. — Ĝis 1914 en 22 landoj en 52 komercaj lernejoj okazis kursoj laŭ tiam eldonita statistiko. El tiuj 16 estas germanaj lernejoj. — Plej grandan atenton ricevis antaŭ la milito la donaco de mondfama franca kaŭĉukindustriisto Michelin de fr. 20.000 al la Societo SFPE por disdoni, kiel premiojn al junuloj lernantaj E-n. La E-aj gazetoj enhavis reklamojn de la aŭtogumradoj de Michelin. — La Int. Asocio por Komerca Instruado eldonis sian programon por sia int. kongreso en Wien en germana kaj E lingvoj. Estas menciinde, ke en 1908 E. Wucher aperigis kajeron dulingvan: germanan kaj E-an pri Duobla Librotekado. — Post la milito la komercaj fakvortaroj kaj frazaro de R. Kreuz kaj A. Mazzolini, ankaŭ komerca koresponda libro de R. Kreuz estas la plej valoraj eldonoj. En la lasta enestas la transportletero de la Pariza

Komerca Ĉambro, kiu estas presita en franca kaj E-a lingvoj.

Prospektoj. En la katalogo de Davidov (1911) estas listo de 11 komercaj prezaroj, katalogoj kaj prospektoj. Laŭ tiu listo oni eldonis ĉefe 1—2 paĝajn foliojn, sed jam troviĝas ankaŭ rimarkindaj eldonaĵoj. Eble la plej famaj estas tiuj de la granda angla farmacia firmo kaj fabriko Borroughs, Wellcome and Co., kiu ĝis nun ofte ree eldonis prospektetojn en E. La plej malproksime eldonita estis »Prezaro de Nov-Zelandaj Produktaĵoj de Carswell« eldonita en 1907. La plej ampleksa el la fruaj eldonoj estis la 36 paĝa prospekto de la Consettferofabriko el 1907 kaj la 48 paĝa ilustrita katalogo de tiam granda foto-fabriko Hüttig A. S. en Dresden. — Menciinde estas, ke tiamaj konataj skribmaŝinfabrikoj, kiel la Ideal, Yost, Hammond kaj Oliver eldonis il. katalogojn en E. — Laŭ la supra listo la unuaj komercaĵoj, kiuj portis la nomon »Esperanto«, kaj havis pri tio prospekteton, estis la ,E' sapo de angla firmo Goodliffe, Nottingham, la ,E' bonbonoj de A. Perkowski, Kovno, kaj ,E' ĉokolado de svisa fabriko Tobler kaj Kio, Bern, (kiu poste fabrikis ĉokoladojn kun Ido-reklamoj). — Jam en 1910 la pariza fabriko Debernay et Cie eldonis sur 18 paĝoj prospekteton pri la E-aj kaj »supersignitaj« preslitteroj. — Samjare aperis la unua prospekto pri aŭtomobiloj, eldonita de Clément Bayard, Paris. Plej grandan sukceson signifis antaŭ la milito la apero de prospekto de la Porcelan-Fabriko en Meissen Saksujo, kiu laŭ reklamo en E gazeto ricevis konsiderindan mendon el Anglujo. Ankaŭ la germana firmo Reiner, Berlin, publikigis en 1914, ke laŭ reklamo en E gazetoj ĝi ricevis dum du monatoj 439 mendojn el 32 landoj. — Tiutempe precipe la Saksa, Bavara kaj Würtembergia E Institutoj okupiĝis pri disvastigado de komercaj reklamoj en E. La lastnomita atingis gravajn sukcesojn. Al ili oni povas danki, ke ĉe la Int. Kongreso de Komerca Instruado en Budapeŝt en jaro 1913 estis aparta E ekspozicio. — Listo el 1914 jam montras 172 prospektojn,

katalogojn, reklamfoliojn. La aldono de »E Triumfonta«: Int. Komerco enhavis en 1923—24 sub nomo »Int. Adresaro« senpagan firmo-registron pri komercaj firmoj, entreprenoj k. s., kiuj iamaniere uzis E-n. La sama publikigis partojn de leteroj de komercaj ĉambroj por E.

Mono. La int. komercon deziris plifaciligi kaj plisimpligi la spesmilo (v.) kaj la »Ĉekbanko E-ista« (v.), kiu jam uzis tiun monsystemon kaj peris la transpagon de monsumetoj inter E-istoj ĝis eksplodo de la mondmilito. Oni uzis 20.000 ĉekojn kaj 40.000 transpagilpoŝtkartojn, la banko havis 700 konto-posedantojn en 40 landoj.

Int. varborso. Al alvoko de H. Fischer, grandindustriisto en București kunvenis 3 apr. 1923 en Venecia okaze de la Int. Konferenco por Komerca Helplingvo 24 komercistoj kaj oficistoj por ebligi interrilaton per E kaj ekkoni reciproke la vendatajn varojn. La kunveno estis simila al malgranda specimenfoiro. La ĉeestantoj montris specimenojn aŭ prezarojn de varoj kaj provis fari negocon. Kelkaj sukcesis. Ili fondis societeton sub nomo »Int. Varborso«, kiu havis duan kunvenon dum la UK en Nürnberg. Poste la societo ĉesis doni vivsignon. — Similan celon havis rubriko en »Int. Komerco« nomita »Borso de UK« publikigante senpage ofertojn kaj serĉojn de varoj (1923—24).

Societoj kaj gazetoj. La unuaj komercaj gazetoj estis la Export E-ist, eld. en Chicago (1909—24) kaj la Komercabulteno, organo de la komerca fakto de UEA, eld. en Dijon en 1911. (Red. W. Vogler). UEA havis kiel apartan fakon la unuan komercan organizon por E-istoj. Alia klopodo estis, ke komercaj gazetoj naciilingvaj enhavu E-ajn partojn, resumojn simile al aliaj fakgazetoj naciilingvaj. Laŭ la katalogo de Davidov la gazeto »Organisation«, germanlingva fakrevuo komerca kaj industria, eld. de H. Th. Hoffmann, Berlin, en 1907 havis unuafoje konstantan E-an fakon.

UEA estis inter la unuaj, kiuj servis ankaŭ praktike por komercistoj.

Jam en 1914 inter la delegitoj estis 285 el komerca branĉo, el ili 126 komercistoj, 15 agentoj, 47 komercioficistoj, 41 bankoficistoj kaj 16 industriistoj. En sia gazeto sub »Reciproka Informado« estis konstanta rubriko, kiu enhavis demandojn kaj ofertojn pri vendotaj kaj aĉetotaj varoj. Similan rubrikon ĝi enhavis en postmilitaj jarkolektoj sub rubriko »Int. Komerco«.

La komercaj servoj estis ofte gravaj kaj videble kreskis. Laŭ statistiko la delegitoj anoncis al Centro plenumitajn komercajn servojn: en

1909	1910	1911	1912	1913
1120	1513	2698	2835	3710

Post la venecia konferenco aperis unuafoje propono en la gazeto de UEA ke ĝi havu apartajn delegitojn nomitajn »Komercaj Delegitoj« (K. D.) en ĉefaj lokoj, por esti je dispono en specialaj komercaj servoj, informoj, ktp.

En 1913 fondiĝis en Paris »E-ista Komercakaj Industria Asocio«, kiu enhavis konstantan komercan ekspozicion en sia ejo kaj deziris aranĝi grandan komercan E-an ekspozicion okaze de la UK en Paris.

En 1917 s-ino Farges aranĝis ĉe Lyon-a Foiro E-an oficejon kun ekspozicio, post la milito oni imitis tion en preskaŭ ĉiuj gravaj foiroj, sed kelkaj (ekz. en Budapeŝto) havis jam antaŭmilite E-standojn.

En 1914 SFPE eldonis franclingvan broŝuron por komercistoj de Rollet de l' Isle.

Laŭ la statistiko el 1914 tiam estis dek komercaj fakgrupoj en 7 landoj. En 38 landoj 968 firmoj kaj komercistoj havis E-istojn (ĉu kiel ĉefojn, ĉu kiel oficistojn). Tamen en tiu nombro enestas ankaŭ la apotekistoj, inĝenieroj, ktp., kiuj funkciis kiel delegitoj.

Dum la milito eklaboris en Britujo kaj en kelkaj landoj (ekz. Argentino, Polujo, Belgujo, Svisujo) komitatoj por la prop. D-ro H. Unger eldonis de 1919—22 bone redaktitan gazeton Int. K-a Revuo, Zürich. Poste provis la E Triumfonta (HDE) aperigi kiel aldondon en marto 1923—okt. 1924 grandformatan, interesan gazeton Int. K. red. de H. Unger kaj R. Kreuz. La intereso denove ne estis su-

fika kaj post ĉesigo UEA donis aldon al sia «E», sub titolo *E k o n o m i a K u r i e r o*, red. de R. Kreuz. Ĝi aperis nur en 1925.

Tiutempe eklaboris sub gvido de d-ro H. Unger simila komitato »Svisa Asocio por la Universala Komerca Lingvo«, fondita en 1919. En Gand la nomo de simila belga komitato estis »Pro Belgica«. Tiuj komitatoj akiris por prez-oj gravajn personojn.

Dum la milito la en London fondita Komitato por Komuna Komerca Lingvo aranĝis interesan eksperimenton. En diversaj landoj — apartenantaj ĉefe al la »entente«-ŝtatoj, samtempe komencis lerni E-n komercaj oficistoj kaj poste ili samtempe korespondis unu kun la alia. La celo estis pruvi, ke komercistoj el diversaj landoj povus jam post kelkmonata studado de sia oficistaro enkonduki E-n. La eksperimento estis nek sufiĉe konigata al komercistaro, nek energie daŭrigata, por konstante dokumenti la eblecojn per E.

La ekkomenca-entuziasmo postmilita baldaŭ ĉesis kaj la komitatoj eksilentis. Similan sorton havis E-fako de japana ampleksa komerca revuo »The World Salesman« kaj la franca ledindustria gazeto »Le Cuir«, kiu en 5 lingvoj, ankaŭ E-e publikigis listojn de ledindustriaj firmoj.

En 1919 fondis Leander Tell en Stockholm svedan societeton por komerca lingvo, kiu fariĝis poste »Int. Federacio por komuna komerca lingvo« sub lia prezido kaj havis grandan fakkunvenon en 1922 dum la UK en Helsinko. Dua kunveno estis dum la UK en Nürnberg, sed la kunveno en Vien estis jam parte malsukceso. La gazeto »Int. K-a Revuo« estis oficiala organo de la federacio, poste la »Int. K.« de »E Triumfonta«, sed la komerca movado denove montriĝis malforta, la fakrevuoj kaj fakaldonoj ĉesis kaj ankaŭ eksilentis la federacio.

Similan sorton havis la *K o m e r c a M u z e o*, fondita kun simila celo (varinterŝanĝo, konstanta ekspozicio), post la milito en Paris per Méras, kiu eldonis gazeton parte en E.

Estas menciinde, ke en 1924 oni fondis en Fulde, Germanujo, »Ekonoman Unuiĝon de Int. Katolikaj Ko-

mercistoj«, kiu deziris precipe la katolikajn komercistojn interrilatigi per E.

En Aŭstrujo estis projekto pri apudanduba komerca societo, sed ĝi eksilentis. En Paris fondiĝis la *E k a j K o m e r c o*, asocio por la disvastigo de franca komerco per E, kiu funkcias ankaŭ nun. Ĝi eldonis aparte bulleton, kiu aperis sur la paĝoj de *L a M o v a d o*.

En Japanujo mallongtempe laboris E Komerca Korporacio.

Apud Dresden fondiĝis en 1922 la Komercista E Unio, (KĔU, v.) kiu tamen ne estas societo de komercistoj, sed prop-ejo por precipe germanaj varoj per E, havante agentejojn en diversaj landoj. Ĝi eldonas informan bulleton kun ofertoj kaj anoncoj.

Terminaro Komerca aperis en n-ro 2. (majo 1923) de »Int. K.« Similan oni eldonis, kiel projekton por aldoni al ŝlosiloj, red. de prof. Cart, dum la komerca konferenco en Paris, 1925. Liston de varoj aperigis E-e la Foiro de Leipzig en 1918 (Listo de la Komercaj Branĉoj) kaj poste ankaŭ la Foiro de Frankfurt. P. BALKÁNYI.

Foiroj. En la postmilitaj jaroj la plimulto de la int. foiroj unu post la alia ekuzis E-n por reklamo. Kelkaj foiroj, ekz. tiuj de Leipzig, Frankfurt, Budapeŝt, Lyon, Reichenberg, ktp. eldonis afiŝojn, prospektojn, glumarkojn, cirkulerojn regule kaj en rimarkinda nombro. La Unio de l' Int. Foiroj en Milano rilatas favore al E. En la lastaj jaroj pro la malkresko de la int. komercaj rilatoj ankaŭ la uzo de E malkreskis ĉe la foiroj. (l. la ĉiujarajn raportojn de ICK.)

Informoficejoj. Ilia unua mondkongreso, okazinta 1930 en Vien, unuvoĉe akceptis rezolucion pri enkonduko de E en la sferon de la informoficejoj. Josef Eugen Kun, la ĝeneraldirektoro de »Confidentia«, aranĝinto de la kongreso, ankaŭ estas amiko de E.

Kompātinda Klem. Rakonto originale verkita de Merchant. 1931, 90 p. »Amuza rakonto, kiu neniam enuigas la leganton. La stilo estas sen-

riproĉe agrabla.» (Totsche, L M, 1932, p : 57.)

Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado en Esperanto. De Fruictier, reviziita kaj kompletigita de Grenkam p-Kornfeld. 1930, 200 p. »La libro kunigas la antaŭajn verkojn de Fruictier; sed ĝi enhavas ankoraŭ la 16-regulan gramatikon, ĉapitron pri fonetiko, koncizan, sed sufiĉan traktaĵon pri versfarado. Klara, objektiva kaj bonlingva instruilo por homoj enpenetremaj en nian lingvon.» (Berger, H D E, 1930, n-ro 30.)

Komunismo. v. Marksismo.

Komunista Internacio (komintern) pridiskutis la demandon pri E en sia 2-a kongreso, 6 aŭg. 1920, kiam hispana delegito Pestana proponis, »ke ĉiu oratoro en int. kongresoj parolu en la plej facila por li lingvo kaj ke el ĉiu parolado estu farata nur unu traduko en helpa lingvo E.« La propono estis transdonita al Ekzekutiva komitato por pristudo. Similan proponon prezentis al Komintern skribforme Raymond Lefebvre, Bombacci kaj 23 aliaj subskribintoj. Rezulte la sekretario de Komintern formis specialan studkomisionon en konsisto de J. Pogány (ekskomisaro en Hungara Sovetrespubliko), Henri Guilbeaux kaj Hans Itchner. En la 3-a kongreso de komintern, 12 julio 1921, la demando pri LI. denove estis preparolita kaj oni denove komisiis la aferon al la Ekz. Komitato. Sub influo de P idisto Itchner, sekr. de la studkomisiono, tiu ĉi lasta nemuln studis. Per du voĉoj de Itchner mem kaj Guilbeaux, malgraŭ sindeteno de la prez. Pogány, la komisiono decidis aprobi E-n kaj I don samtempe, sed rekomendis al ĉiuj komunistoj lerni prefere I don kiel »pli perfektan« ol E. Tiu ĉi »decido«, neniam aprobita de komintern mem, estis blufe uzita de P idistoj por propagando de I do en komunistaj medioj kaj sur ĝia bazo kelkaj kom. partioj, ekz. Ĉeĥoslovaka, Meksika, Greka, Luksemburga, Ruĝa Sport-Internacio, Int. Laborista Helpek. a. organizaĵoj alprenis respektivajn rezoluciojn. Baldaŭ tamen la sekretariĉejo de Ekz. komitato de K. I. oficiale likvidis la komisionon sen alpeno de

ia ajn decido ĉu pri E, ĉu pri I do. De post tiu fuŝafero la demando pri L. I. neniam estis retuŝata en la kongresoj de K. I., sed ĝia sekretariĉejo ofte interesiĝis pri la movado.

v. ĜSKI. N. NEKRASOV.

Kondicionalo estas uzata

1. en ĉefpropozicioj:

a) por montri emon por io, aŭ la eblon de ago okaze de P estonta plenumiĝo de io. Ekz.: mi volonte korrespondus kun vi; ni bedaŭrus vian malfeliĉon; mi irus promeni, se la vetero iĝus pli bona;

b) en esprimoj necertaj pro ĝentilo aŭ dubo, anstataŭ indikativo. Ekz.: mi volus ion diri; mi dezirus vin vidi; ĉu vi donus al mi fajron? ĉu mi devus vin forlasi?

c) por esprimi, ke supozo fiktiva, ne plenumita, kunportus certan agon aŭ staton. Ekz.: mi estus feliĉa, se mi estus riĉa (mi ne estas riĉa); ĉe bonaj cirkonstancoj mi entreprenus tiun aferon (la cirkonstancoj ne estas bonaj);

2. en dependaj propozicioj:

a) por montri, post se, ke la supozo dirita ne estas plenumita. Ekz.: se vi estus farianta vian taskon, mi vin rekompencus (supozo fiktiva: la tasko ne estas farita);

(Se la supozo estas ebla, oni uzas indikativon. Ekz.: se vi faris vian taskon, mi vin rekompencos.)

b) por akcenti, ke la enhavo de P dependa propozicio ne respondas al la realo. Ekz.: ni diris al vi nenion, kio estus malvera (Z).

c) post la konjunkcia kvazaŭ, kiu same montras, ke la diro estas nereala. Ekz.: li aspektas, kvazaŭ li estus maljuna (li ne estas maljuna, sed se li estus, li aspektus same).

(Ĉe la adverba kvazaŭ oni uzas indikativon. Ekz.: mi kvazaŭ falis el la ĉielo. La adverbano kvazaŭ (kvazatiĉe) oni povas ekkoni per tio, ke ĝi estas en ĉefpropozicio, aŭ, se ĝi troviĝas en propozicio dependa, tie estas ankau konjunkcio. Ekz.: ĉu vi memoras la vintron, kiam ni kvazaŭ glaciĝis en nia ĉambro?)

3. en ĉkkriaj frazoj, por montri deziron. Ekz.: se li venus! se mi sukcesus!

KALOCSAY.

Kondo Kuniomi, japano, bibliotek-

isto. Nask. 17 majo 1905 en Kagosima. E-isto de 1923. Studis lingvosciencan en Imperia Univ. de Kyôto kaj prezentis al ĝi kursofinan tezon pri kompara studo de artefaritaj lingvoj. Prez. de XXI-a JE-Kongreso en Kyôto. Diligenta gvidanto de E-ista Ligo en Kyôto. — (Kuw.)

Konferencoj. La Kontrakto de Helsinki antaŭvidis ankaŭ la okazigon de teknikaj konferencoj, sub la aŭspicioj de ICK, aplikantaj E-n en praktika maniero. Via konferenco jam estis okazinta je pasko 1922 en Genève, nome la Int. Konferenco pri E en Lernejoj. Ĝin kunvokis la Pedagogia Instituto J. J. Rousseau en Genève kaj partoprenis centoj da instruistoj el 28 landoj kaj ne malpli ol 16 reprezentantoj de registaroj. Multaj raportoj pri la kongresoj de la E-a instruado estis prezentataj al la Konferenco kaj samtempe multe da interesa materialo estis kolektata por la sekretario de la Ligo de Nacioj, kiu tiam okupis sin pri E.

En 1923 en la paskaj tagoj okazis la Int. Konferenco por komuna komerca lingvo en Venetio, invitita de la Komerca ĉambro por Svisujo. Krom diversaj ŝtataj reprezentantoj kunvenis kelkaj centoj da delegitoj de Komercaj Ĉambroj, Foiroj kaj ekonomiaj organizaĵoj. La konferenco liveris interesajn raportojn pri la jam faritaj spertoj kun E en la komerco.

En aprilo 1924 Prepara Konferenco por int. Radiotelefona interkonsento en Genève okupis sin pri la divido de la ondlongoj por radio-disaŭdigo kaj pri la uzo de E en tiuj disaŭdigoj.

Je pasko 1925 okazis en Parizo samtempe 2 konferencoj, nome la Int. Konferenco por uzado de E en Sciencoj puraj kaj aplikitaj, organizita de la Int. Scienca Asocio E-ista, kaj la Dua Konferenco por la uzado de E en Komerco kaj Industrio sub aŭspicioj de la Societo »E et Commerce« kaj la Komitato de la Pariza Foiro.

Dum la diversaj konferencoj, en kiuj ĉeestis multaj reprezentantoj de naciaj Societoj, okazis ankaŭ kunsidoj de ICK kun KR kaj la komitato de UEA. Tiamaniere prezentis sin la ok-

azo havi kunsidojn de la gvidantaj komitatoj ankaŭ inter la ĉiujaraj kongresoj.

La paska tempo de 1926 ne vidis specialan teknikan konferencan, sed tamen okazis kelktaga kunveno de la nomitaj komitatoj en la historia salono en Locarno, kie estis subsignita antaŭe la interŝtata Pakto de Locarno.

La antaŭaj konferencoj estis okupintaj sin senpere pri la problemoj de *int. lingvo kaj akceptis rezoluciojn*, favorajn al E. Pli grava tamen estis la uzo de E praktike kaj kiel nura traduka lingvo en Konferenco Paco per Lernejo, kiun dum la paskaj tagoj de 1927 la Int. Eduka Oficejo el Genève kunvokis en Praha. Kaj same la interreligia Konferenco por la Paco en Hago, tuj antaŭ la Antwerpena Kongreso en 1928 realigis la aplikon de E kiel nura traduka lingvo.

Denove je pasko 1929 sub aŭspicioj de la Foiro Oficejo kunvenis en Frankfurt am Main Int. Konferenco por Turismo kaj Reklamo, kie ankaŭ ĉiuj paroladoj, se ne faritaj en E, estis tradukataj nur en tiun lingvon.

Kvankam ne tiel plene, E faris ankaŭ utilajn servojn por tradukado en la Tutmonda Kongreso de la Universala Federacio de Pedagogiaj Asocioj en Aŭg. 1929 en Genève, en kiu kongreso partoprenis multaj E-istoj.

J. R. G. ISBRUCKER.

20—24 majo 1934 okazis en Wien Int. Konferenco: E en la lernejoj kaj la praktikon. La eksterajoj, ĉefe la oficialaj akceptoj (Miklas, Dollfuss, Schuschnigg) pravis, ke la aŭtoritatuloj en Aŭstrujo rekonis la praktikan valoron de E.

Konfuciismo. Verkoj en E: 1. La vortoj de Konfucio, 1-a parto. 1923, 95 p. Esenco de la K., kompilita de disĉiploj de tiu granda filozofo. La karakteriza koncizemo de l' originala stilo bone respegulita en la traduko. — 2. Granda lernado kaj doktrino de mezeco. 1932, 68 p. La du unuaj libroj de la Konfuciana Biblio, ĉefe konsilioj kaj instruoj precipe al la regantoj de l' popolo. La traduko atente sekvis la esprimmanierojn de l' klasika originalo tiel, ke ĝi estas

bonvena legajo por la sciencaj studentoj, sed la stilo monotona kaj enua. — 3. La libro-konstantajo de fila piceo. 1933, 50 p. Esenco de la praktika etiko de la K.: instruoj pri la gefilaj devoj. Peza stilo. — Ĉiuj tri verkoj tradukitaj el la ĉina klasika lingvo, la 1-a de K. Ossaka, la 2-a kaj 3-a de K. Nohara. Laŭ MATUBA-K.

Kongo Belga, Afriko. La unuaj informoj pri E-agado datas el 1905. Pioniroj estis Fr. Hela en Shangugu (Lac Kiou kaj Lucien Christiaens (belgo el Bruxelles), mortinta en 1905. Laŭ la Dietterle-statistiko en 1928 E-istoj troviĝis en 5 lokoj. UEA-del. en 1933 en Costermansville kaj Panga.

I. SIRJAEV.

Kongresoj Universalaj. (UK). UK estas ĉiujare videbla provo de ekzisto kaj vigleco de E. El ĝi, E-isto, kiu ĉeestas, ĉerpas freŝigitan entuziasmon, kaj plifortigon de la interna ideo, kiujn hejmen reveninta, li transdonas al siaj samideanoj; la unua kongreso, kiun ĉeestas nova E-isto, havigas al li neforgesablajn impresojn. UK ankaŭ impresas forte la ne-E-istojn, kaj, pro tio, konsistigas mirindan propagandon.

I. Oficiala Organizo.

En la kongreso de Genève (1906), estis decidata: Krei konstantan komitaton de la kongresoj (KKK), konsistantan el Int. Organiza Komitato (OK), elektita de ĉiu kongreso por prepari la sekvantan; Loka Komitato, apudmetita al ĝi por difinita loka tasko; konstanta ĝenerala sekretario de la kongresoj, kiun disponas la OK.

En la kongreso de Cambridge (1907), estis akceptata Kongresa Regularo; ĝi difinas la personojn, kiuj povas partopreni la kongresojn, la celon de tiuj kongresoj, la temojn priparolotajn, la konsiston de KKK, la estrarojn de la kongresoj.

En la kongreso de Dresden (1908), KKK estis reorganizata; ĝi enhavas kiel membrojn: du anojn de la OK de la antaŭa kongreso, du anojn de tiu de la nuna kongreso, du anojn de la venonta, unu prezidanton elektitan de la kongreso mem, unu ĝeneralan sekretario, same elektitan.

Estis ankaŭ aprobita fondo de Kongresa Kaso, kun la celo alcentrigi ĉiujn elspezojn rilatajn al la kongreso, enspezi la kotizojn, donacojn, subvenciojn, ktp. La loka komitato povas esti rajtigita de la KK por fari mem la elspezojn, aŭ parton de ili. La profito lasita de antaŭaj kongresoj estas, laŭ decido de KKK, uzata por pagi eventualajn defecitojn aŭ konservata por helpi venontan kongreson.

Laŭ la deziro esprimita de la 5-a kongreso (1909), estis kreata Int. Konsilantaro, por zorgi pri la financaj rimedoj de oficialaj Institucioj (Lingva Komitato kaj Konstanta Komitato de la Kongresoj).

En 1911, laŭ propono de Z, estis decidita de la kongreso, ke: partopreni en la kongresoj kaj en ĝiaj diskutoj havas la rajton ĉiu, kiu pagis la kotizon kaj submetiĝas al la kongresa regularo, sed rajton de voĉdono havas nur la regule elektitaj delegitoj de E-istaj grupoj aŭ societoj. Tiuj rajtigitaj delegitoj estis ankaŭ elektitaj en 1912 kaj 1913.

Laŭ la kontrakto de Helsinko (1922), la Int. Centra Komitato (ICK) decidas pri okazigo de la kongresoj, kaj komisiis ilian organizon al Konstanta Kongresa Komisiono, kiu entenas du reprezentantojn de la ICK; du anojn de la loka komitato de la estinta kongreso, du de la estanta, kaj du kuratorojn de la Kongresa Kaso. La kontrakto ankaŭ difinas la komitaton de la kongreso.

Laŭ Interkonsento de Kopenhago (1933), la nova UEA organizas la Kongresojn.

II. Arangoj, Festoj, Kunsidoj, ktp.

La diversaj arangoj de kongreso estas ĉiam la samaj, kaj fakte fariĝas tradiciaj. Efektive eksperimento montras, ke ili estas plej taŭgaj por atingi la celon: laborigi la kongresanojn, sed ankaŭ distri ilin sufiĉe, por ke ili ne enuu, kaj ne tro, por ke ili ne estu tro lacaj por labori.

Urbo de Kongreso estas elektita de la ĵus antaŭa kongreso, laŭ propono de la loka grupo aŭ nacia societo; invito devas ankaŭ esti farata

de oficiala nacia aŭ urba institucio. KKK (Kaj poste ICK) ekzamenas plie ĉu la E-istoj de la urbo estas sufiĉe multnombraj kaj agemaj por garantii sukceson, ĉar la organizo necesigas grandajn ag- kaj monrimedojn kaj lertan personaron.

La kongreso daŭras ok tagojn, de la monato de julio, aŭgusto aŭ septembro. Antaŭ ĝi, okazas kelkfoje antaŭkongreso en alia urbo, tra kiu devas vojaĝi multaj kongresanoj; ankaŭ iafoje, postkongresoj okazas. Karavanoj estas organizitaj de privatuloj aŭ E-istaj societoj.

Laboro de la kongreso efektiviĝas en kunsidoj, kiujn povas kaj eĉ devas ĉeesti ĉiuj kongresanoj. La unua estas malferma kunsido, solena kaj, pro tio, impresa. En ĝi, oni aŭdas ĉefan paroladon, iam faritan de Z. mem, kaj poste de prez. de ICK, kaj saluton de reprezentantoj de kongresanoj de ĉiu nacio; kaj fine de la delegitoj de estraroj aŭ naciaj institucioj.

Dum kongreso okazas kunsidoj de la oficialaj institucioj de la movado; Lingva Komitato kaj Akademio, ICK, ktp. Estas la nura okazo, kiu permesas al la membroj de tiuj institucioj interkonatiĝi, kaj parole diskuti la gravajn demandojn, kiujn ili devas solvi.

De 1922, la ĝenerala kunsido de UEA, okazas dum la UK.

Ankaŭ kunsidas la diversaj fakaj societoj, kiuj se eble, vizitas la samfakajn societojn de la urbo por propagandi. Diservoj estas farataj en la diversreligiaj preĝejoj.

Raportoj de la oficialaj institucioj (Lingva Komitato, ICK), estas legataj, kaj laŭokaze aprobatataj de la kongreso post diskutado. Ili estas publikigitaj en broŝuro disdonata al la kongresanoj (Dokumentaro).

Tiuj lastaj ankaŭ ricevas diversajn dokumentojn, inter kiuj Kongresan libron, kiu entenas programon de la kongreso, kaj sciigojn pri la naciaj kutimoj kaj vidindaĵoj de la urbo; Kongresan Gazeton, kiu aperas ĝenerale ĉiumonate antaŭ la kongreso.

Por distri la kongresanojn estas organizitaj interkonatiĝa vesperoj, la unuan tagon, dum kiu kong-

resanoj libere interparoladas; teatra prezentado de verko de nacia aŭtoro E-en tradukita kaj, se eble, ludita de naciaj aktoroj; int. balo, kiun ĉeestas la kongresanoj en naciaj kostumoj; komuna festeno, tre malkara por ke ĉiuj povu ĉeesti; ĝenerala ekskurso, kiu daŭras unu tutan tagon, por viziti rimarkindan vidindaĵon de la urbo aŭ ĉirkaŭaĵoj. Postkongresaj vojaĝoj estas organizitaj de privataj entreprenoj tra la lando.

Akceptejoj, aranĝita en taŭga domo, ricevas la kongresanojn tuj post ilia alveno; tie oni sciigas ilin pri loĝejoj kaj oni donas al ili la dokumentojn, pri kiuj ni parolis supre; ili ankaŭ trovas en ĝi vendejon de E-ajoj, ekspozicion, ripozĉambron, poŝtoficejon, ktp.

III. Kongresoj.

1-a (1905) — Boulogne sur Mer (Francujo). (En 1904 kelkaj anglaj kaj francaj samideanoj kunsidis, kaj la sukceso estis tiel granda, ke oni decidis kunigi denove la sekvantan jaron.) D-ro Z ĉeestis; neimagebla entuziasmo. Provizora starigado de Lingva Komitato. Deklaracio pri difino de E-ismo. Unua prezento de la E-a flago. — 2-a (1906) — Genève (Svisujo). Definitiva starigado de L. K. Deklaracio pri la neŭtraleco de la kongresoj. 3-a (1907). — Cambridge (Britujo). Organizata de tri E-istoj, kiuj alprenis la nomon: la trio por la tria; unua oficiala sukceso: la urbestro de Londono publike aprobas E-n. — 4-a (1908) Dresden (Germanujo). Prezento de Ifigenio de Goethe, tradukita de Z, ludita de la fama germana aktoro Reicher kaj de lia filino, kiuj speciale por tiu okazo lernis E-n. — 5-a (1909) Barcelono. La unuan fojon okazis Floraj Ludoj imitataj de la katalunaj. — 6-a (1910) Washington (Usono). D-ro Z, malgraŭ sia malbona farto, transiris Oceanon por ĝin ĉeesti. Prezidata de la direktoro de Panamerika Oficejo; akcepto ĉe la ministro de Eksteraj aferoj de Usono. — 7-a (1911) Antverpeno (Belgiujo). Ĉeestis la rajtigataj delegitoj de la E-istaro, elektitaj laŭ propono de Z mem. — 8-a (1912) Krakovo (Polujo). Z diris: »Tiu kon-

greso estas la lasta, ĉe kiu vi vidos min antaŭ vi; poste, se mi povas veni al vi, vi ĉiam vidos min inter vi.» Kaj klarigis la kaŭzon de tiu decido. — 9-a (1913) Bern (Svisujo). — 10-a (1914) Parizo: ne okazis, kvankam tute organizita, pro la ĝenerala mobilizado okazinta la tagon je kiu devis malfermiĝi la kongreso. — 11-a (1916) San Francisco (Usono). Pro la milito, la kongreso ne povis okazi en Edinburgo (Britujo) kiel estis projektita; nur la usonaj samideanoj sukcesis aranĝi tutamerikan E-an kongreson, kiu anstataŭis la dek-unuan. — 12-a (1920) Hago (Holando), kiu montris fidon de niaj holandaj samideanoj. — 13-a (1921) Prago (Ĉeĥoslovakujo); komenco de revivo de nia afero. — 14-a (1922) Helsinki (Finnlando); kontrakto inter UEA kaj la naciaj societoj de propagando. La unuan fojon ŝtatestro, la prezidanto de la Finna Respubliko, oficiale akceptis la kongresanojn. — 15-a (1923) Nürnberg (Germanujo). — 16-a (1924) Wien (Aŭstrujo), entenis 3.600 kongresanojn, sed dank' al kriza valuto estis grava deficiito malfacile kompensita de la tuta E-istaro. — 17-a (1925) Genève (Svisujo). — 18-a (1926) Edinburgo (Britujo) — 19-a (1927) Danzigo — 20-a (1928) Antverpeno (Belgujo) — 21-a (1929) Budapeŝt (Hungarujo) — 22-a (1930) Oxford (Britujo) — 23-a (1931) Krakovo (Polujo). — 24-a (1932) Parizo. — 25-a (1933) Köln (Germanujo). Jubilea Kongreso. — 26-a (1934) Stockholm (Svedujo). — 27-a (1935) Roma.

ROLLET DE L'ISLE.

N o t o. Pluaj detaloj pri la unuopaj UK-j en la laŭlandaj artikoloj. Krome aparta rubriketo pri ĉiu kongresurbo. Aliajn kongresojn v. Katolika movado, Laborista movado ktp.

Konjunktivo. v. Subjunktivo.

König Lajos, hungaro, prof. de komerclernejo. Nask. 19 aŭg. 1889 en Szekszárd. Li estis la gvidanto de la movado en Miskolc, verkis gramatikon (en la gazeto »Reggeli Hírlap«), gvidlibron pri Miskolc.

Konsisto de la Esperantistaro. (Parolinte pri la movado post 1908): Tiu E-istaro ne estis plu unuforma, kiel tio eblis en la komenca periodo.

Hector Hodler ĝuste traktis en la decembra No de gazeto „E” de la jaro 1913 la diversspecon de homoj aliĝintaj al E-movado, kiun partoprenis liavorte samtempe: »elementoj progresaj kaj idealistaj, homoj kun utopia mentaleco, stranguloj, manuloj kaj aliflanke malkontentuloj, ambiciloj aŭ-simple amatoroj.« Daŭris veni al la lingvo idealistoj kaj idealismanoj de pura speco. Multaj, amatore ekinteresiĝintaj pri la lingvo, poste estis kaptitaj per la »ideo interna.« Tiu unua parto de E-istoj estis sendube plej fortika kaj plej fidela por la lingvo. Tiuj personoj estis plej konstantaj legantoj, kunlaborantoj kaj abonantoj de la E-gazetaro. Ili estis aĉetantoj de la libroj. Ili estis la ĉefaj konservantoj de la lingvo. Al E venis jam ankaŭ aliaj personoj, celantaj tujan aŭ eventuale estontan bonuzon aŭ profiton per E-an. Tiuj personoj, trovinte en E ion, kio ligis ilin al la lingvo, estis lojalaj, inertaj, kontraŭreformemaj. Ili formis la rezistan povon de la E-ista popolo. Tiu dua parto de E-istoj enhavis veran miksaĵon, resp. egulantan ĉiujn societavolojn kaj tendencojn. Al ĝi apartenis filatelistoj, korespondantoj, utiligantoj de E por propagando de iuj aliaj ideoj, entreprenistoj diversspecaj, eldonantoj de certa parto de ĉiujare naskiĝantaj kaj malaperantaj E-gazetoj ktp. Inter tiuj personoj troviĝis kandidatoj por organizi novajn societojn, ligojn, asociojn — ĉu naciajn, ĉu internaciajn. Ili ofte emis al bruaĵaj titoloj kaj al brua agado. Ili ofte ellaboradis plej grandiozajn projektojn. Ili luktis inter si por gvidoroloj. Se personoj de tiu dua kategorio komencis disreviĝi en E, se ne estis por ili ligoj aŭ ekonomiaj, ĉu moralaj, retenantaj ilin ĉe la lingvo, tiuokaze ili aŭ iris for el la movado, aŭ ekokupis sin pri rezonado, reformado, lingva eksperimentado ktp. Por la praktika E-movado ili perdiĝis. Bonan ekzemplon tiurilatan prezentas R. de Saussure, ne sukcesinta en praktika uzigo de E inter la scienculoj, malsukcesinta en daŭrigo de la gazeto »Int. Scienca Revuo«, kaj fine sin okupinta nur pri ellaboro de sen nombraj diversaj reformo-projektoj.

Ĉiuokaze la nombro de la restantoj ĉiam superis la nombron de la forirantoj. La E-istaro kreskis.

E. DREZEN.

Al ĉi tiuj ofte tre trafaj konstatoj, cititaj el la Analiza Historio (p:57.) estu aldonata-interesa statistiko. En 1928 Reuben Algot Tanquist akiris doktoran gradon ĉe la Universitato en Minnesota per disertacio, kies temo estis, kial oni lernas E-n. Alvenis 750 demandiloj kaj inter la kaŭzoj estis: internaciaj aferoj (pacafero, homa frateco ktp.) en 29, lingvistiko en 24, korespondado en 14, vojaĝo en 13, politika kaj religia propagando en 8, amuzo en 4, kolektado en 3, radio en 2, diversajoj en 3%-oj.

Konstanta Komitato de I Kongresoj. (KKK.) Estis fondita en 1906 dum la dua UK laŭ propono de G. Moch. Ĝi havis la taskon interkonsenti kun la Loka Komitato pri organizo de la kongresoj, prizorgi la starigon de tagordo kaj aranĝi ĉiujn nelingvajn kunvenojn de la kongresoj. Ĝi konsistis el po du anoj de la du lastaj kaj de la okazonta kongresoj. Kiel sidejo de la KKK estis elektita la Centra Oficejo en Paris.

Konstanta Reprezentantaro. La tuto de la reprezentantoj de la naciaj E-societoj laŭ la Kontrakto de Helsinki. (v.)

Konstantopoulos G. Demetrio, greko, milita farmaciisto. Nask. 12 aŭg. 1893 en Arta. Malnova E-isto, kiu fondis grupon en Arta jam 1909. En Joanina li instruis E-n en la klasika gimnazio kaj varbis multajn eminentulojn de sia restadejo.

Konsuloj. Antaŭuloj de la nuntempaj UEA-delegitoj. Laŭ propono de A. Carles el Béziers (Franc.) la dua UK en Genève 1906 decidis la starigon de konsuloj por plenumi reciprokajn servojn. La konsuloj estis elektitaj de la societoj kaj grupoj. Ilia nombro estis en 1906 120, 1907 232, 1908 303.

Kontrakto de Göteborg. v. Laborista movado.

Kontrakto de Hachette. (inter Z kaj H.) Noto: la teksto estas france redaktita; la ĉi-suban tradukon verkis G. Waringhien.

I. Unuflanka Cedo.

Parizo, la 30 Julio 1901.

Mi, subskribinto, Dro Lazaro Ludoviko Zamenhof, elpensinto de la internacia lingvo Esperanto, loĝanta en Varsovio, strato Dzika n-o 9, deklaras per ĉi tiu dokumento, cedi al Sro de Beaufront, laŭ kondiĉoj parole konsentitaj inter ni, la ekskluzivajn rajton por ĉiuj landoj publikigi ĉiujn verkojn destinitajn al la propagando kaj instruado de tiu lingvo, laŭ la praktika kaj literatura vidpunktoj; kontrakti tiucele por Francujo kun de li elektota eldonisto, kiu mem rajtos subkontrakti kun la eldonistoj de la diversaj fremdaj landoj. Tiuj verkoj, kiuj devos esti antaŭe prezentitaj al mi, estos aprobitaj de mi ekskluzive je ĉiuj aliaj; ili surhavas la mension de tiu aprobo. Mi devontigas min persekuti, konsente kun Sro de Beaufront kaj liaj eldonistoj (tiuj eldonistoj prenos sur sin ĉiujn kostojn de la persekutoj kaj eventualaj procesoj) ĉian konkurencon publikigon aŭ falsajon, kiu povus esti farita je la malprofito de niaj komunaj interesoj.

2. Duflanka Kontrakto.

Inter Dro Zamenhof kaj Sro de Beaufront.

Dro Zamenhof devontigas sin:

1. eldonigi nenium el siaj verkoj rilataj al tiu lingvo, krom per la eldonistoj elektitaj de Sro de Beaufront.

2. doni sian aprobon al la aliaj verkoj rilataj al tiu lingvo, nur se iliaj aŭtoroj konsentas eldonigi ilin per la ĉi-supre difinitaj eldonistoj.

3. permesi al neniu traduki liajn verkojn en aŭ pri tiu lingvo, krom se la tradukisto konsentas eldonigi ilin per la de Sro de Beaufront elektitaj eldonistoj. Pri la persekutoj aluditaj en la supra cedo, ĝi konsernas nur la verkojn, kiuj surhavas ian ajn aprobon de Dro Zamenhof, kontraŭe al la kondiĉoj de ĉi tiu kontrakto... (Artikolo 1-a)

Siaflanke Sro de Beaufront devontigas sin:

pagi al Dro Zamenhof kaj al liaj heredontoj aŭ reprezentantoj la $\frac{2}{3}$ de la sumoj, kiujn li ricevos kiel rajtopagojn aŭ de la aŭtoroj kaj tradukistoj, aŭ de la eldonistoj de tiuj verkoj...

Por la verkoj rilataj al Esp-o, kies aŭtoro estos li mem, Sro de Beau-

front devontigas sin pagi al Dro Zamenhof $\frac{1}{3}$ de la sumoj, kiujn li ricevos de la eldonistoj, kiam tiuj verkoj estos nur tradukoj de libroj verkitaj en Esp-o aŭ en ia ajn lingvo de Dro Zamenhof. Por la verkoj rilataj al Esp-o, kiuj estos pli originala kaj persona verko de Sro de Beaufront, li pagos al Dro Zamenhof 10% de la ricevotaj sumoj... (Art. 2-a)

Sro de Beaufront absolute nenion deprenos por li mem pri la verkoj de Dro Zamenhof, kiuj estos eldonataj aŭ reeldonataj jen per la firmo Hachette, jen per aliaj kun tiu kontraktintaj... (Art. 4-a)

En okazo de morto de Dro Zamenhof, estas konsentite per ĉi tiu dokumento, ke Sro de Beaufront heredos la rajton pri ekzameno kaj aprobo dum la tempo, dum kiu daŭros la literatura posedrajto (proprieteco) de la Doktoro kaj de liaj heredontoj aŭ reprezentantoj. Tiuj ĉi devos heredi nur la financajn rajtojn de Dro Zamenhof. En okazo de morto de Sro de Beaufront antaŭ la ĉeso de la aludita literatura posedrajto, la rajto pri ekzameno kaj aprobo transiros al Sro René Lemaire, doktoro pri juro, loĝanta al Epernay (Marne) por la tuta cetera tempo... (Art. 10-a.)

Historieto de tiuj kontraktoj, skizita de Carlo Bourlet (franclingve):

En 1901 (februaro aŭ marto), per miaj personaj rilatoj kun Bréton, mi decidigis la firmon Hachette eldoni E-ajn librojn. Mi rilatigis Sron de Beaufront kun Bréton. Mia rolo tie finiĝis. Estas Sro de Beaufront, kiu, kun Sro Lemaire, aranĝis la aferon, elpensis la »Aprobita de Z« kaj redaktis la du suprajn kontraktojn. Mi ne konis tiujn du kontraktojn dum unu jaro.

En Junio 1902, Bréton komunikis al mi la cedon, en Julio 1902 Cart komunikis al mi la Kontrakton. Mi pasigis la tutan vintron 1902—03 provante rompiĝi tiujn kontraktojn. De Beaufront kontraŭstaris sovaĝe (»à opposé une résistance farouche«). Mi publikigos lian sugestan korespondadon. Li cedis nur, kiam Z fine skribis al li (mi havas la respondan leteron de Z), ke, ĉar oni ne volas

detruji la kontraktojn, li mem nuligos ilin rifuzante sian aprobon al ĉiuj verkoj.

La du kontraktoj estis rompitaĵ, kaj anstataŭigitaj per ununura rekta kontrakto inter Z kaj Hachette. Mi ne havas la precizan tekston, sed mi konas ĝuste la enhavon:

1. Hachette havas la ekskluzivan rajton eldoni la verkojn de Z kaj la verkojn de li aprobitajn.

2. Z. ricevas 20% por aŭtorrajtoj, kaj 2% por aprobarajtoj.

3. Hachette estas devigata publikigi aŭ aranĝi publikigon en la Kolekto de gramatikoj, vortaroj ktp. en la 7 ĉefaj eŭropaj lingvoj...

(Noto: la leteroj de Beaufront al Sro Bourlet en tiu jaro 1902 malaperis. Ankaŭ la de li aludita letero de Z.)

Kontrakto de Helsinki. v. Organizo.

Kontrakto de Kolonjo. (Interkonsento). v. Organizo.

Kontraŭmilitistoj, v. Militrezistado.

Kopar ps. de K. Kalocsay (v.)

Köppen Vladimir, germano, d-ro, meteorologo, univ. prof.; nun en Graz. Nask. 25 sept. 1846 en Petrograd (Leningrad). Proks. 350 sciencaj traktajoj. Artikoloj en E en Sciencia Revuo kaj Germana E-isto.

Korespondado. Ne ekzistas nacia lingvo, kiu havas en la privata korespondado inter diversnaciaj tiel gravan rolon, kiel E. Multaj personoj lernas E-n nur por letere interrilati kun alilandanoj; specialan altirforton havas la korespondemuloj en malproksimaj landoj. La motivoj kaj celoj estas la plej diversaj. Troviĝas multaj, kiujn interesas la fremdaj homoj kaj kutimoj; aliaj volas interŝangi diversajn aĵetojn, plej ofte poŝmarkojn; denove aliaj ŝatus trovi amikon, kiu estas adepto de la sama idearo; troviĝas personoj, ĉe kiuj la motivoj eliras el amo; alia parto korespondadas pro profesiaj aŭ sciencaj kaŭzoj. La korespondado pere de E havas specialan valoron por la paca eduko de la junularo. La gravecon de la korespondado en E pruvas i. a., ke la japanaj E-istoj eldonis 310 paĝan libron pri la

praktika gvido de la korespondo en E (de Ishiguro).

v. Adresaroj.

Koreujo, Azio. Korea E Asocio (KEA) estis fondita de Verda E. Kim en sept. 1920. Ĝi estis la unua ES en K. Antaŭ tiu tempo estis nur izoluloj. En jul. 1922 Oojana fondis Seoulan ES. Dank' al la energia funkcio de ambaŭ grupoj aperis multaj fervoraj E-istoj. En jun. 1924 SES ŝanĝis sian nomon je Korea E-Instituto. Poste fondigis ankoraŭ kvin grupoj, fondintoj: S. Yamamoto, O. Col, Rju Kidong, Stelaro Pajk, N. Hüang, k. a. Gazetoj eldonitaj: Verda Tajdo, 1925, aperis 2 n-roj, Orienta Lumo, 1925, dek kelkaj n-roj, Verda Ĝardeno, 1 n-ro, La Voĉo, 4 n-roj. La ĉiutaga ĵurnalo »La Dong-A Ilbo« helpis multe en la prop.

SOKTAJ ĈANG kaj STELARO PAJK

Kornfeld Salo, v. Grenkamp.

Korte Pieter, nederlandano, instr. popollerneja (estro). Nask. 17 jun. 1894 en Beerta. Gvidis multajn kursojn laŭ Cseh-metodo. Agis ekde 1927 kiel agento de TAGE, post la germana naciŝocialista ekregio 1933 aranĝis, ke la funkcioj de la laborkomitato por TAGE kaj IPR transiris al Nederlando; nun ĉefa laboranto por TAGE. Verkis artikolojn, kuntradukis la Fletoj.

Koser Ljudovit, d-ro, inspektoro de la ministerio por eksteraj aferoj en Beograd. Pioniro antaŭmilita. Verkis en 1908 la unuan slovenan lernolibron de E, fondis samjare la unuan E-grupon en Slovenujo.

Kostariko, Centra Ameriko. En 1905 aperis tie la gazeto E - a Skarabaro. Laŭ la Dietterle-statistiko en 1928 E-istoj troviĝis en du lokoj. UEA-del. en 1933 en San José.

Kostiainen (kostiajnen) Ville Jussi, finno, sekr. de Laborista Sporta Asocio de Finnlando, estrarano de Socialista Sportinternacio. Nask. 1 majo 1889 en Sulkava. Kunfondinto kaj prez. de FLEA. Verkis artikolojn en E pri sporto.

Kötz (kōc) Bernhard, germano, libristo. Nask. 7 jan. 1882 en Waldenburg. Eklernis E-n 1902, aktiviĝis 1907. Prezidis la tiaman Saksan-Turingan E-

istan Ligon, kaj fondis eldonejon de la Ligo, kiu ŝanĝiĝis en 1908 al Germana E-Librejo. Eldonis multajn E lernilojn kaj literaturon. En 1910 akiris la E-Eldonejon Hoffmann, kaj en 1919 la E-eldonaĵojn de Germana E-Gazeto. En 1921 kunfando de la Germana E-Eldonejo kaj Librejo kun la firmo Ferd. Hirt und Sohn, Leipzig. Tie li oficas kiel dir. de la E-fako. Partoprenis 13 int. E-kongresojn kaj konferencojn. Prez. de ES en Leipzig. Verkis krom prop. artikoloj Hirts E Taschenwörterbuch (kunverkinto: A. Degen), el kiu disvendigis 35.000 e-roj; mallongan lernilon; Int. Kantaron.

Kotzin Boris, sovetiano, hebreo, ĵurnalist-redaktoro, nevo de Z. Nask. en Kovno 1887. E-isto de 1902. Kunlaboris en LI kaj aliaj E-gazetoj, tradukis multajn verkojn de Ĉehov, Gorkij k. a. En 1910—15 K. estis red. de La Ondo de E kaj en 1911—13 vicprez. de Moskva Societo E-ista. K. verkis la plej kompletan kritikon kontraŭ Ido Historio kaj teorio de Ido, 1913, kiu aperis ankaŭ en germana traduko, 1916. En 1920 K. enkondukis E-n en Soveta sindikato de artistoj kaj en ties organo »Rabis«. Estis membro de CK de SEU 1926—28.

Kovács (kováč) Tóder, hungaro, pens. ŝtata fervojoliristo; instr. de sten. Nask. 31 dec. 1879 en Jászberény. E-isto de 1904 kaj eklaboris por E en Fiume (nun en Italujo). Multaj paroladoj kaj artikoloj, propagando inter la stenografoj kaj fervojistoj. En 1929 broŝuro pri Ĉe la fervojoj. Red. de eta gazeto Revuo, 1932—33.

Kowalski Johano Mario Mihaelo, d-ro, arĥiepiskopo, ĉefulo de la maria-vita religio, (v.) loĝas en Plock, Polujo. Nask. 25 dec. 1871. Laŭ lia ordono ĉiuj m-aj pastroj devas posedi E-n kaj en ĉiuj m-aj lernejoj E estas instruata.

Kozeny Josef, ĉeĥo, prof. mezlern-
eja en Mladá Boleslav. Nask. 16 apr. 1904 en Nymburk. Multaj prop. paroladoj en vasta ĉirkaŭaĵo de lia naskiĝ-
kaj loĝurboj kaj trad. E-ajn publikajn paroladojn de Scherer, Ajayi, Nišimura, ktp. Komitatano de ĈAE. Kunla-

boras al Ĉeĥoslovaka Antologio.

Kozłowska (koziŭska), »Panjo«, fondintino de la mariavita religio (v.), kiu aprobas E-n.

Kozma János, hungaro, grekkatolika pastro. Nask. 19 okt. 1884 en Mezőzombor. Prop. broŝuro, 1917. En 1922 eld. kaj red. de *Katolika Revuo*. Artikoloj.

K. R.: Konstanta reprezentantaro (v).

Kraemer Cristiano, brazilano, publika tradukisto kaj ĵurnalisto. Mortis en 1923. Pioniro en B. (1896). Fond. kaj unua prez. de ES Sud-Rio Granda (1906); fond. kaj unua vicprez. de »Gremio E-ista E. Backheuser« en Porto Alegre (1923).

Kraków. Urbo en Polujo, iama rezeido kaj kroniĝurbo de polaj reĝoj; 205,260 loĝantoj. — 8-a UK 11—18 aŭg. 1912; 946 kongresanoj el 28 landoj; 25-jara jubileo; lasta kongresa parolado de Z. — 23-a UK 1—8 aŭg. 1931; 713 kongresanoj el 30 landoj; inaĝuro de Z-strato.

Kraljević Marko, la unua proza originalaĵo en E, verkita de M. A b e s g u s, 1897, 15 p. Aperis ankaŭ en rusa traduko, 1915.

Kramers Martina Gezina, nederlandano. Nask. 24 junio 1863 en Veur, † 15 okt. 1934. Batalantino por la rajtoj de la virinoj, havis diversajn funkciojn en la movado tiucela. E-istino de 1926. De tiam fervore laboris por E, gvidis kursojn kaj verkis multajn prop. artikolojn.

Kraner Fritz, germano, d-ro fil., supera lerneja konsilisto. Nask. 6 febr. 1867 en Einsiedel. Sukcesa peranto inter la saksa instruistaro kaj la ministerio por popolklerigo. Artikoloj en IPR kaj aliaj periodaj gazetoj.

Kraus Vojtech, ĉeĥo, urba oficisto. Nask. 13 febr. 1865 en Praha, mortis 26 sept. 1928. Prez. de EK en P., del. de UEA de la fondo ĝis sia morto. Kunfond. de Bohema Asocio E-a. Organizis la movadon en P.

Krenicki Iz., d-ro, kuracisto en Varsovio. Nask. 26 jan. 1874 en Wilno, Polujo. E-isto de 1895. Kunorganizinto de E-Rondo en V. Membro de la Lo-

ka Monumenta Komitato en V. Artikoloj en E-aj med. revuoj.

Krestanov Ivan H., bulgaro, lektoro de fremdlingvoj. Nask. 28 okt. 1890 en Pirdop. Loĝas en Sofia. Dum sia 15-jara vivado en eksterlando vizitis preskaŭ tutan Eŭropon. E-isto de 1905. Eldonis dudekon da libroj kaj libretoj en kaj pri E, gvidis kursojn, faris paroladojn. Senlaca kaj entreprenema aganto. L. K. Inter liaj verkoj: *Bulgara Antologio*; *La bulgara lando kaj popolo*; *Vortaro de E por bulgaroj* (aperis 3 eldonejoj, 10.000 e-roj. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Krestomatio. v. Fundamenta Krestomatio.

Kreuz (kreŭc) Robert, germano, dir. de UEA. Nask. 2 jun. 1894 en Mainz. Antaŭe oficisto kaj fakestro en la industrio. Vojaĝoj kaj restadoj en diversaj landoj faris lin vasthorizonta homo, kiu parolas multajn lingvojn. Eminentulo sur la stenografia kampo. Farigis E-isto en 1908-9, post la milito revigivanto de SOL kaj kunlaboranto de REVELO, ĉefdelegito de UEA, sukcesa kontraŭbatalanto de Ido, red. de E Triumfonta, en 1925 ĝen. sekr. de ICK, en 1930 direktoro, de 1933 dir. de UEA. Konst. ĝenerala sekr. de UK-j, eminenta oratoro, unuagrada interpretisto plurlingva kaj tradukisto, pteĵ rapida E-stenografo. Inicitinto de la foira reklamo per E, kiam oni kreis la int. foirojn en Frankfurt. L. K. kaj kunlaboranto de ĉiuj grandaj E-gazetoj. Verkoj: *Vortaro de komercaĵoj E-Ĝ*, 1920; *Komerca Vortaro en E* (kunlabore) 1927; *Varolistoen E*, 1919—24; *La problemo de int. helplingvo por komerco kaj trafiko* (dulingva), 1924; *konversacia libro G-E*, 1926; *komercaekzercaro*; 500 komercaj frazoj en E, 1928; *Debata stenogr. E-alaŭ Stolze-Schrey*, 1926; *Eŭropo ĉe la Abismo* (trad. de Nitti), 1923; *Eŭroposen Paco* (trad. de Nitti, finpresita, sed retemita de la eldonejo), Frankfurt, 1926. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Krijt (krejt) Pieter, nederlandano, bankoficisto. Nask. 16 sept. 1894 en

Zaandijk. Prez. de sekcio Amsterdam II. de FLE. Gvidis kursojn.

Kriminologio. Verko de R. V á m b é r y, el la hungara trad. V. T ó t h 1924, 86 p. »Ĝi temas pri la deveno, la historio, la diversaj skoloj, la rilato al punsistemoj, de P' prikrimaj studoj, pri la sociaj kaj individuaj kaŭzoj de P' diversspecaj atencoj.« (G. S., 'E' 1924, p. 188.)

Kristal Ladislav, ĉeĥo, faka instr. en Lom u M. Nask. 26 jan. 1894 en Slany. E-isto de 1912. Gvidas ĉiujare kurson. Sekr. de Amika Rondaro E-ista, eld. ĝian ciklostilitan bultenon.

Kriss Juljusz, pola. Nask. en Lwów 1891. Organizis la studentan E-movadon en Kraków (kursoj, klubo). Multaj prop. artikoloj. Originala poemaro *Melodioj de P' nokto*, 1914, 31 p. Kunlaboris al *Pola E-isto*; *E-ista Voĉo*; *La Revuo*.

Kristana E-ista Ligo Int. v. KELI.

Kristanismo kaj Patriotismo, de L e o T o l s t o j, el la rusa trad. I. M a ĉ e r n i s. 1931, 112 p. »Tolstoj post la efektive iom ridindaj renkontiĝoj de la franca-rusa maristaro dum 1893 verkis tiun pamfleton, en kiu li montris, ke tiuj ŝajne porpacaj aranĝoj . . . trompas la popolojn, ke patriotismo troigita kaj miskomprenata rekte kondukas al militoj.« (G. S., 'E' 1931, p. 97.)

Kristnaska Sonorado. Rakonto de D i c k e n s, el la angla trad. Martyn Westcott. 1905, 83 p.

Kritiko en E. La historia evoluo de la recenzo reprezentigas per la gvid-principoj de la tri ĉefaj recenzologoj.

H. Aspremont (XVI. jarcento): »La recenzo estas superflua kaj malutila akcesoraĵo de P' literaturo, ĝia parazito.«

T a i n e: »Recenzi estas nepre necese. La tasko de P' konstrua kritiko estas klarigi la jam ekzistantan literaturon, evoluigi la verkistojn kaj tiel plibonige efiki je P' estiĝantaj verkoj.

W i l d e: »Kritiko estas arto potencumita, ĉar dum la materialo de P' arto estas la naturo, tiu de P' kritiko estas la arto mem.«

Ĉi tiuj tri principoj respeguligas ankaŭ en la E-a recenzo, kiel tri evoluogradaj. Antaŭ la milito la

recenzo preskaŭ tute mankis en E. La bibliografiajn rubrikon en la gazetoj »La Revuo« kaj »Lingvo Internacia« gvidis brilaj nomoj kaj bonaj plumoj: Cart, Bourlet, Noel, Ned K a t r i n (tre sprita kronikisto de kongresoj), P a ŭ l o L e n g y e l, C o r r e t ktp., sed ili tute ne faris al si la penon skribi verajn recenzojn, iliaj skribabajoj konsistis en laŭda saluto al la »pliriĉigo de nia literaturo« kaj en prilingva kritikado koncernanta preskaŭ ekskluzive la gramatikon kaj la vortaron. Kelkaj pli diligentaj recenzistoj (ekz. V e r t o en »Esperanto«) fervoris pri la longa rakontado de P' enhavo. Vere valormezuranta kritiko, rigardanta la verkojn kiel artkreaĵojn, priraktanta stilvalorojn, internan konstruon, esprimforton, la artistan individuecon de P' verkisto, serĉanta la adekvatan stilefekon en tradukoj — ĉio ĉi eĉ ĝerme ne ekzistis. Kaj ĝi ankaŭ ne povis ekzisti — por tio mankis loko en la gazetoj, mankis tempo kaj emo — estis la epoko de Aspremont.

Post la milito montriĝas certa evoluo. En la recenzoj de S t r o e l e, (Esperanto) B u t i n (Heroldo), B a n h a m (La Suda Kruco) oni jam klare vidas la tendencon: okupiĝi pri la literatura kaj stila valoro de P' verkoj. Sed aliflanke, en aliaj gazetoj daŭras plu la antaŭa stato, eble eĉ pli malbone: ia flankenparolemo, harfendado, virina kapricemo, trudo de personaj (ofte ne ĝustaj) opinioj karakterizas multajn recenzrubrikojn.

Apartan lokon okupas de komence K a l o e s a y en L. M. En liaj recenzoj (aperintaj ofte sub ps. Kopar, -y) la estetikaj vidpunktoj iĝas estrantaj, la unueca starpunkto de P' kritikisto esprimiĝas en ĉiu juĝo, la lingva kaj stila kritiko estas severa sed neniam harfenda, ĉiam instrua, neniam persona: oni vidas la konsekvencan klopodon por la konstruo de literatura stilo (l. recenzojn pri Natan la Saĝulo, Idoj de Orfeo, Reĝo Lear, Saltego trans jarmilojn ktp.) En L. M. aperis ankaŭ la literaturaj studoj de H o h l o v, kiu per ili iĝis iniciatinto de la kritika eseo. En la »International Language« la delikata valortrovemo, belamo kaj certa juĝkapablo de New-

e li (Eleno Vinfero), ekfloris en mal-longaj, sed trafaj kaj leginspiraj recenzoj. Samloke recenzis Sturmer: subjektiva, kelkfoje malforta kaj iom kaprica, sed ofte sagaca kaj sprita. Johnson skribas koncize, kvazaŭ kundensigante paĝojn en unu linion, sed liaj frazoj ĉiam trafas, kvazaŭ martelo najlokapon. En la dua periodo de L. M. la recenzoj de Waringhien distingiĝas per larĝa kulturo, delikata kompreno pri stilvaloroj kaj formproblemoj. Samloke Totsche, kun siaj severaj principoj estetikaj, prefero al intelektaj valoroj, klopodo al absoluta, sentempa artperspektivo, ofte donas mestare ĝueblajn literaturajojn; skribinte la unuan memstaran kritikan libron (De paĝo al paĝo) li fariĝis ekiriginto de la tria periodo: kritikoj kiel arto memstara.

Recenzistoj, krom la menciitaj: Nekrasov, Barthelmes kaj Emba (La Nova Epoko), Weinhengst (La Socialisto) okupigantaj precipe pri la sociala tendenco de la verkoj kaj aŭtoroj; Major (Oomoto): vastaj recenzoj, sed ofte longa rajdado sur »amata ĉevaleto«; Karl Minor (Germ. E-isto): same, sed en recenzoj mallongaj; T. Jung (Heroldo), malofta recenzanto, sed klarvida kaj klarjuĝa rekonanto; Szilágyi (L. M.): iom senpacienca kaj subita, sed kun oftaj ekbriloj de sprito; Lejzerowicz (L. M.): certa gusto, objektiva juĝo; Jaume Grau Casas (Kataluna E-isto): entuziasma adepto de poezia belo. Krome sennombraj recenzantoj funkcias en diversaj gazetetoj, sed ili ne disvolvis individuecon sufiĉan por esti karakterizitaj.

GEORGO KARZAG.

Noto de M. C. Butler. La artikolo estas tro unuflanke prezentita: en sia entuziasmo pri unu flanko oni forgesas esti justa al la alia. Oni povas ja diri, kaj vere, ke en la unua periodo grandparte mankis verkoj originalaj. Pro tio, oni emis ne kritiki la originalan klasikan aŭtoron kies verkon oni tradukis, sed pli atenti la stilon de la tradukinto, kaj la ĝustecon de la traduko, eĉ la gramatikan ĝustecon. Kaj tio, aparte en la unua stadio de la lingvo, estis aparte grava,

kaj ĝuste tion la legantoj deziris legi. Nuntempe, kiam oni pli multe verkas originale, kaj kiam la verkoj estas pli ampleksaj, estas pli da ebleco kaj motivo kritiki la verkon mem.

Kroataj Poeziaĵoj. Trad. M. Spicer. 1912, 62 p. »Riĉa kolekto de belaj, harmoniaj pecetoj de la kroata literaturo.« (LI, 1912, p: 417.)

Kroata Kacumi, japano, prof. de japana historio en Imperia Univ. de Tokyo, membro de Imp. Akademio. Nask. 3 sept. 1874 en Nagasaki-ken. Patro de la J E-movado: energie klopodis por organizo de la movado en la komencaj jaroj. En 1908 kun Sinmura partoprenis la 4-an UK kiel unua japano. De la fondo de JEI ne agas aktive. Unu el la direktoroj de JEI. Kun aliaj verkis: E-J Vortaro, 1906; Plena E-J Vortaro, 1914.

Królewska 41. (elp. Kruleska, signifas: reĝa). Strato en Varsovio, kaj n-ro de domo en ĝi, kie loĝis dum siaj lastaj jaroj Z kaj lia edzino. 16 apr. 1917 je la 15-a horo tie eliris la funebra ceremonio de Z (v. Entombigo de Z) kaj 8 dec. 1924 sama, sed jam pli multnombra procesio de Klara Z. La infanoj: Adam kun sia familio; Sofio kaj Lidja loĝas ankoraŭ en tiu loĝejo. Dum ĉiu E-a okazantaĵo en V. »la Familio« invitas la samideanaron je teo kaj aranĝas varman akcepton. Estas nun la deziro de la pola E-istaro aĉeti tiun domon kaj aranĝi tie muzeon E-an. E. WIESENFELD.

Kronenberg Leopold, polo, instr., poste diversaj profesioj, de 1921 okupis sin nur pri E. Nask. 15 okt. 1890 en Bochnia, mortis 7 aŭg. 1929 en Varsovio. Eldonis multajn verkojn en pola lingvo. Liveris al la pola literaturo pere de tradukado el la E-a: »Derviŝoj« de Tigr Pogosian el la araba kaj novelojn de la hungara F. Herczeg. Estis kunlaboranto kaj eldonanto de polaj gazetoj. Kun Eli konatiĝis en 1909. En 1912 akiris prof. diplomon ĉe Int. Instituto de E. Samjare li eldonis lernolibron por memlernantoj, (33.000 e-roj). En 1912 red. de l' Kongresa (ĉiutaga) Bulteno. Post la milito li reeldonadis sian lernolibron, gvidis kursojn en diversaj urboj, (ankaŭ en profesiaj societoj), veturis

tra la tuta lando kun prelegoj. En 1926 la P Eksterlanda Ministerio aranĝis E-an Presservon (agentejon) kaj li estis ĝia gvidanto. Aperis de li pli ol 100 prop. artikoloj en la plej legataj polaj gazetoj; enkondukis en multajn revuojn sisteme kursojn de E. La lastajn jarojn de sia vivo li vivtenis sin nur per la E-a agado, kaj ekkonis la veran mizeron. E. T. kaj H D E ofte publikigis liajn tre interesajn artikolojn. Entute: la plej aktiva E-isto en Polujo inter 1912 kaj 1929, neelĉerpebla, nelacigebla optimisto.

E. WIESENFELD.

Kronitaj verkoj de la Akademio.

Jam antaŭ la milito la Akademio starigis komisionon por proponi el la aperintaj libroj tiujn, kiuj pro sia bonlingveco kaj bonstileco meritas esti laŭdataj de la Akademio. Tia publikigo de la laŭdoj okazis unuafoje en 1914. kiam la laŭditaj verkoj estis: Estu Homo! (Wagner-Meyer), Rik-ke Tikke Tak (Conscience—Posener) Mirinda Amo (Luyken); La Vendetta (Balzac—Merckens); Rolandkanto. (Noël). — Post la milito en 1923. la Akademio restarigis tiun komisionon, sed ĝi funkciis ne kontentige. Unuparte la granda kvanto da libroj, kiujn la eldonejoj devis dissendi al ĉiuj Akademianoj (ĝis 20 el ĉiuj libroj) igis la eldonejojn ofte ne sendi librojn, kiuj sendube estus ricevintaj la laŭdon, aliparte tiuj laŭdoj publikigis ĉiam longe post la apero de la libroj, perdante tiel ĉiun efikon je la favoro de ilia disvastigo kaj perdigante al la eldonejoj la valoron de la tiel dissenditaj libroj. Pro tiu kaŭzo post la jaro 1930. tiu oficiala akademia laŭdo de la verkoj ĉesis, ĉar la koncerna komisiono dum jaroj ne ricevis librojn laŭdotajn.

Komprenable la nuna listo estas nenia valortakso de la esperantistaj verkistoj kaj tradukistoj (ekz. neniu verko de Forge aŭ Engholm estas laŭdata, de Kalocsay nur la plej malgranda traduko), sed nur kvazaŭa vicigo de la senditaj, por tiu celo »oferitaj« verkoj. Tio, ke el la tuta kronita verkaro iu aŭ alia verkisto rolas per granda procento de la libroj, montras (krom ke tiu libro ne estas malbonlingva) nur la ofere-

mon kaj entuziasmon de la koncernaj eldonistoj, aŭ de la verkistoj, sed neniel lian pozicion en nia literaturo.

La Akademia iniciato estis bela, sed por ĝin fakte efektiviĝi, nia movado bezonus finance fortan kaj pro tio bone organizitan akademion ne kun memvolaj, sed kvazaŭ honorariataj kunlaborantoj.

Jen la listo de la postmilitaj kronitaj verkoj:

1923: Riermann kaj Dorotea (Goethe—Küster); Idoj de Orfeo (Bulthuis). 1924: Preter la vivo (Baghy); Johano la brava (Petöfi—Kalocsay); 1927: Kataluna Antologio; 1928: Danco Marionetoj (Baghy); 1929: Prozo ridetanta (Schwartz); La tajdo (Hohlov); La alta kanto (Jung); Fabelo (Wiseman—Ramo); Luno de Izrael (Haggard—Payson kaj Butler). 1930: La Leono de Flandrujo (Conscience—Bulthuis).

Krucumo. De D r o z d o v, el la rusa trad. H o h l o v. 1922, 56 p. »Epizodo de l' lasta rusa revolucio kaj akre montras la diversecon de opinioj pri ĝi en unu sola familio. La tradukinto majstras nian lingvon.« (G. S. ,E', 1923 p : 44.)

Krumpholz Josef, ĉeĥo, dir. de la Prerov-a burĝa lernejo. Nask. 19 okt. 1870 en Hradčany. Satata pedagogia verkisto, kunlaboris kun Ĉejka pri unuaj ĉefaj lernolibroj.

Krysta (krista) Ludwig, germano, ŝtata eksfocisto, urba konsilantarano en Ĉesky-Tešín (Ĉeĥoslovakujo.) Nask. 7 dec. 1877 en Lipowiec. E-isto de 1920. Prez. de loka EK kaj de 1931 de la Regiona E-ista Ligo fondita de li. Fervora kursgvidanto, kunlaboranto de pluraj E-gazetoj. Liaj beletristikaj verkoj aperis parte en la eldonaĵoj de Kennigott, parte memstare (Pri la prononcado en E; Marionetaj ludoj; La senvola svatan- to).

Kubo, Centra Ameriko. Pioniro estis d-ro E. F. Rodriguez. La movado komenciĝis en 1904, la unua gazeto presinta pri E (en hispana lingvo) estis »Escritura Veloz«, stenografia gazeto. En 1907 en Santiago aperis la unua societo, samjare en tiu ĉi urbo oni

instruis E-n en superaj lernejoj. En 1909—10 aperis E-gazetoj *Kuba Stelo* kaj *Cuba E-ista*. En Habana en 1910 oni fondis Societon Kuban por la prop. de E. kiu, reorganizita en 1913, ekzistas ĝis nun. En 1914 ĝia prez. estis fama verkisto Mochado, eksambasadoro en Ĉilo. Laŭ la Dietterle-statistiko en 1928 E-istoj troviĝis en 43 urboj. En 1933 UEA-del. nur en Habana. I. ŠIRJAEV.

Kubo (antaŭe: Okonogi) Sadajiro (-roo), japano, studento de pedagogio en Imperia Univ. de Tōkyō. Nask. 12 majo 1909 en Asikaga, Totigi-ken. E-isto de 1928. Agema konsilanto de JEL; UEA-del.

Kudela Antonin, ĉeĥo, juĝa oficisto en pens. Nask. 21 nov. 1870 en Svinov. E-isto de 1908. Del. (de 1910) kaj honora membro de UEA. Prez. de la loka grupo. Ano de la Moraviaj E-Pioniroj, komitatano de ĈAE dum pluraj jaroj. Kursgvidinto.

Kühbacher (kübaĥer) Roland, aŭstro-germano, Prez. de EK Innsbruck. Bona prop-isto; kursgvidanto.

Kuhl Bronislaw, (ps. Baroko), polo. Nask. 19 aŭg. 1886. E-isto de 1906. Aktiva prop-isto en Krakovo. Lerta tradukisto kaj kritikisto. En 1912 aperigis lernolibron de E. Originale verkadis plejparte recenzojn kaj kritikojn en *P E-isto*, *British E-ist*, *La B e la Mondo*, *Universo*, k. a. Tradukoj: *Ni sekvu Lin* de Sienkiewicz, *Legendoj* de A. Niemojewski kaj *Lupo, Hundoj kaj Homoj* de Dygasinski.

Kühnl (künl) Eduard, ĉeĥo, oficisto de ĉeĥoslovaka diplomatia servo. Nask. 16 majo 1884 en Praha. E-isto de 1900, pioniro de E, Kunfondinto de EK en P. Fond. de Bohema Unio E-ista en 1908 kaj gvidis ĝin ĝis la mondmilito. Estis unu el tiam maloftaj E-istoj-turistoj. En 1903 vojaĝis tra Germanujo, Svisujo, Francujo, serĉante kaj vizitante E-istojn, (l. liajn memorojn en *Bohema E-isto*). Es-tante en jul. 1914 en Paris por ĉeesti la UK li estis ekspedita Hispanujon, kie li vivis dum la mondmilito inter E-istoj, partoprenante aktive en la prop. laboro por restarigo de la Ĉe-foslovaka ŝtato. Eld. kaj red. la mo-

natan E-gazeton *Časopis Českých E-istu*, 1907-14. Verkis kaj eld. detalan gvidlibron tra Praha; detalan ĉeĥan lernolibron; ĉeĥan tradukon de la *Fundamento*; ĉeĥan *ŝlosilon*. Estis ano de la Akademio. Post forveturo al Usono, li donacis sian ampleksan E-bibliotekon al Biblioteko de la Nacia Muzeo en Praha.

Kultman Karl, estono, bankoficisto. Nask. 20 aŭg. 1890 en Puhkovo. E-igis 1917. Gvidis multajn kursojn. Prez. de la Narva E Unuiĝo de 6—7 jaroj.

Kun Leo, d-ro, kuracisto en Slav. Brod (Jugosl.). Komitatano de JEL. Red. de *La Suda Stelo* de 1933. Recenzisto.

Kun Pafilo kaj Libro. De A. Isbaha, trad. V. Zamjatin. 1934, 266 p. »Taglibro de simpla soldato en la Ruĝa Armeo, kiu lernas ne nur la militarton, sed ankaŭ ricevas edukon sciencan, industrian, kaj politikan... Certe la libro ne plaĉos al pacifisto... La stilo estas simpla kaj klara.« (J. F., »The British E-ist« 1934, p. 40.)

Kurachi (kuraĉi) Haruo, japano, meĥanika inĝ. Nask. 25 nov. 1899 en Nagoya-si. E-isto de 1922. Kunlaboris kun Iŝiguro. Antaŭe laboris por E en N., nun en Kiboŝa, Tokyo. Trad. al J »Esenco kaj Estonteco de L. I.« de Z, 1927.

Kuracistoĵ, v. Medicino.

Kurijama Ioe, japanino, oficistino de Centra Poŝtoŝicejo de Tokyo. Nask. 10 febr. 1909 en Tokyo-si. E-isto de 1931. Post la morto de s-ino Sasaki zorgas Klaran Rondeton. Partoprenas laboron de Studejo de Z-a Gramatiko, gajnis unuan premion ĉe lit. konkurso de J E-Lit. Societo, 1933.

Kurioza Okazaĵo. Komedio de Goldoni, el la itala trad. Mevo. 1932, 64 p. »La tuta komedio estas mirinde viva kaj majstre lerta. Traduko en bona E... Tamen kun peketoj.« (Kopar, *Bibl. Gazeto*, 1933, p. 49.)

Kursa Lernolibro laŭ praktika parola metodo, verkis E. Privat. 1910, 64 p, 7-a eld. 1930, 78 p. Ĝis nun aperis en 40.000 e-roj. Populara lernilo uzata en multaj landoj.

Kürsteiner (kürstajner) Hans, sviso, komercisto. Nask. 14 nov. 1885 en St.

Gallen. E-isto de 1908. Fondis EG en St. G. Havas gvidajn funkciojn en la loka grupo kaj en SES. Estis ĉefdel. de UEA. Kunlaboris al la Enciklopedio.

Kurzens Nikolajs, latvo, ŝtata oficisto. Nask. 25. junio 1910 en Aluksne, loĝas en Riga. En 1932 vicprez. de Lat ES, de 1932 ĝis aŭgusto 1934. red. de »Ondo de Daugava«. Kunlaboranto de »LM« kaj »Norda Literaturo«. Unu el la plej talentaj originalaj poetoj. Majstro de etaj formoj, per kiuj li diras la krudan realon, sen poezia ornamo, sed liaj komparoj ofte aperas kvazaŭ per forto de revelacio. Liaj tradukoj el la latva apartenas al la plej bonaj tradukitaj poemoj.

Küster Benno, germano, kalkulkonsilisto. Nask. 9 jul. 1861 en Wildeshausen, mortis 24 okt. 1916 en Breslau. Tradukis el la germana Hermann kaj Doroteo, de Goethe, 1911. Kunlaboris al La Revuo kaj Vagabondo.

Kutscher (kuĉer) Ludwik, fininto de la medicino. Nask. en Krakovo, Polujo. Lernis E-n kiel 15-jara gimnaziano. De 1926 aktiva ano de Societo 'E' en K., gvidis junularajn rondojn. En 1929 iniciatis la fondon de sekcio de medicin- kaj farmacistudentoj ĉe TEKA. De 1927 adm. de P E-isto, de 1931 sekr. de PED. Estrarano de UK 1931.

Kuwahara (-ŭa-) Tosihide (-ŝi-), japo, kemiisto de ŝtata Industria Laboratorio, Oosaka. Nask. 20 jan. 1910 en Ooita-ken. Post Sisido gvidis EG en Tria Nacia Kolegio, Kyōto. Arangis Postkongreson en Kyōto 1928. Kunfondinto kaj eksprez. de Sendai ES. Finis kurson de Tōhoku Imperia Univ., Sendai, 1932. Del. de UEA en Oosaka, 1934. J-a delegito de ISAE, 1934. Ĉefaj artikoloj: Statistika rigardo al nuna stato de E-movado en la mondo, LRO 1932 marto; ABC de E-movado, en Jarlibro de JEI 1932. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio. (Kaw.)

Kuzjma Orest, ukrainano, gimn.

prof. Nask. 24 jan. 1893. Fond. kaj prez. de l' landa societo por ukrainaj E-istoj »Progreso« (Kolomyja, Pollando), UEA-del. de 1913. Verkis multajn ukrainajn verkojn. Verkis diversajn E-lernilojn, kunlaboris al multaj E-gazetoj.

Kuzmiĉ Vladimir Savviĉ, sovetiano, ukraina verkisto proleta, aŭtoro de la ukrainlingvaj romanoj »Flugiloj«, »Turbinioj« kaj multaj rakontoj. Nask. en 1904. Aktiva E-isto, verkas ankaŭ en E, membro de IAREV. En E aperis lia originale verkita novelo Solidareco, 1931. Kunlaboris en SAT-organoj.

Kuznecov, ruso. Venis en Japanujon en 1919, instruis per rekta metodo E-n en Niĵpon E-Sya, Tōkyō, en 1920. — (Kaw.)

Kvakeroj. v. Societo de Amikoj.

Kvardek Jaroj. Verketoj dediĉitaj al la 40-jara jubileo de E. SAT, 1927. 48 p. Enhavo: E kaj lingvoscienco; Provo de kvanta elementanizo en E; El la unuaj tagoj de E; Ĉu estis Z — senaciulo?; Evoluo de la interna ideo; Nuntempa stato kaj plua evoluo de laborista E-movado. E kaj edukado, ktp.

Kvinmilonoj. (5.000.000). Rakontoj originale verkita de Grenkamp-Kornfeld. 1931, 113 p. »La lirikajoj, rakontoj estas tre multspecaj, tamen io komuna estas trovebla en ili: la pala anemio. Du aŭ tri paĝoj tamen konsolas min.« (Szilágyi, LM, 1931, p: 70.)

Kvin Noveloj. De Tuglas, el la estona trad. Seppik. 1924, 159 p. Du el la noveloj: En la fino de la mondo (v.) kaj Popikaj Huhuu aperis ankaŭ en apartaj eldonoj. (56 p. kaj 32 p.) »Pri la granda estona novelisto donas tiu ĉi libro tre bonan kaj sufiĉe plenan prezenton. Bonega interpretado.« (Kopar, LM, 1924, p: 180.)

Kyffon-Taylor Gerald, brita, solcitoro kaj notario. Brigad-generalo. Nask. 9 marto 1863 en Liverpool. Brita parlamentano, 1910—15. Protektanto de E grupo en L.

L

La Alta Kanto de la Amo. Originale de T. Jung. 1927, 38 p. »Rimverkita legendo, bela, interesa, emociplena. La formo estas preskaŭ perfekta: ritmo kaj rimoj agrablaj al la orelo. Carma poemo, kiun la Akademio senhezite rekomencis.« (Ak. Raporto, 1929.)

La Amo en la Jaro Dekmil. Fantazia romano de José de Elola, el hispana trad. Berenguer. 1933, 353 p. Du gefianĉoj, kiujn en 2000 trafas mortosimila dormado, estas vekitaj en la jaro 10.000, kiam ĉiuj naciaj lingvoj jam mortis, kaj ĉiuj homoj parolas nur E. »La tradukinto plej lerte kaj fidele faris la tradukon.« (Inglada, HDE, 1933, n-ro 21.)

La Antikva Romo surmare. Prelego de la ĉefministro Mussolini. Trad. el la itala. 1927, 69 p.

La Argentjublea Kongreso. De T. Jung. 1933, 51 p. »Kroniko pri la jubilea kongreso. Plej interesa parto estas motivado de la speciala situacio, en kiu la kongreso okazis.« (F. Szilágyi, »Lingvo Libro«, 1934, p: 30.)

(La) Arthistorio. Vol. I. Ĝis la renesanco. Verkis A. Hekler, por la E-eldono prilaboris A. Kampis, el la hungara trad. K. Kalocsay. 1934 104 teksto- kaj 112 klišopaĝoj. »Tre valoraj libro, kiu kondukas min tra la jarmiloj de arta evoluo, montranta la homan deziron trovi esprimojn pri enanimaj sentoj. Kun komenciĝo en Egipto la fama profesoro ĉe la budapestata universitato igas la leganton rapide marŝi tra la jarmiloj.« (Li, »Svenska Arbetar E-isten«, sept. 1934.) La dua volumo aperos en 1935.

La Arto de Memdisciplino: Psikagogio. Originale de Ch. Baudouin.

1926, 96 p. »Bonega enkonduko en la problemojn de la psikoanalizo, mirinda stilo, ... aldono de listo de fakaj esprimoj kaj de faka literaturo.« (O. Simon, La Socialisto, 1926, p: 100.)

La Batalo de l'Vivo. De Dickens, laŭ la germana traduko E-igis Z. Unue aperis en La E-isto, 1891; en 1910 aparte, 88 p. Unu el la unuaj tradukoj al E.

La Bela Mondo kaj Universo. La plej belaj, plej artaj kaj plej luksaj E-aj periodaĵoj, kiuj ĝis nun aperis; vere valoraj artaĵoj. LBM eliris nur de julio 1908—julio 1909, IV+32—48 p. entute 2 vol. kun 376 p. 24×16. Red. d-ro Schramm, en Dresden. U. aperis de sept. 1909—aŭg. 1912 en 3 vol. kun 384, 384, 294 p. 24×16. Red. prof. Lederer kaj d-ro Schramm, eldonejo: Heckner, Wolfenbüttel.

P. TARNOW.

Labkoro. Mallongigo de laborista gazeta korespondisto.

Laborista movado. Se la maloportuno de la multlingveco kaj la bezono pri int. lingvo estas sentata de la laborantoj sur la kampo de scienco, komerco kaj trafiko, kiuj kutime posedas kelkajn fremdajn lingvojn, des pli forte sin trudas la neceso de tutmonda interkomprenilo al la agantoj en la lab. movado, kies plimulto ĝenerale ne scias iun fremdan lingvon krom sia gepatra. Estis plejparte simplaj laboristoj, eĉ sengramatikuloj, kiuj la unuaj ekkonsciis pri la valoro de E, kun granda peno proprigis al si la lingvon kaj pionire laboris por ĝia disvastigo.

La unuaj lab. E grupoj fondiĝis en 1905—08 en Den Haag, Hamburg,

München, Paris, Stockholm kaj aliaj lokoj. En Britujo starigis en 1907 Brita Ligo de E-istaj Socialistoj, sed ŝajne ne estis lokaj grupoj. En 1911 fondiĝis lab. E Asocioj (LEA-oj) en Ĉeĥoslovakujo, Germanujo kaj Nederlando. Aperis naciaj gazetoj Antaŭen (Germ.), Arbeiter-E-ist (Ned.), Kulturo, (Ĉeĥosl.) kaj Le Travailleur E-iste (Francujo). Jam pli frue aperis int. organo por lab. E-istoj. Marcel Verama (ps. de Paul Berthelot) iniciatis ĝin, eldonante en 1906 Rondirantan Folion por la kreado de tutmonda Socia Revuo. Sekve de ĉi tio kaj laŭ decido de la Ruĝula Kongreseto en Geneve 1906, eliris en jan. 1907 la unua n-ro de monata gazeto »Int. Socia Revuo«. Redaktoroj estis: Fi Blanka Go (ps. de F. Blangarin) 1907—09, J. L. Bruijn 1910—11 kaj W. Nutters, 1912—14. Multan laboron por ĝi faris ankaŭ R. Louis, 1907—09. Okazis kelkfoje, ke en la lasta parto de la jaro ne plu estis sufiĉe da mono kaj oni povis aperi nur unu n-ron en 2 aŭ 3 monatoj. Sed en 1912—13 la abonantaro jam estis pli ol 600 en preskaŭ 20 landoj; legantoj kaj kunlaborantoj troviĝis eĉ en la cara Ruslando. En la eldono de ISR aperis en 1912—14 serio da verketoj de Berthelot, Ferri, Domela Nieuwenhuis, Kropotkin, Lassalle, Liebknecht, London, Stanišić kaj V. Hugo; gravan traduklaboron faris D. Ivanski kaj W. Nutters. Pro la militeksplodo en 1914 ISR ĉesis aperi. (En 1920 Nutters klopodis revivigi la revuon, sed li sukcesis aperi nur 6 n-rojn).

Organizo tutmonda starigis en 1906. Ĝi estis la Int. Asocio Paco-Libereco, poste nomata Liberiga Stelo. Ĉefaj aktivuloj: Fi Blanka Go kaj R. Louis; celoj: batali kontraŭ militismo, kapitalismo ktp., disvastigi E-n ĉe internaciistoj, liberecanoj, socialistoj ktp. La asocio eldonis kelkajn broŝurojn kontraŭ militismo, patriotismo kaj religio; ĉi tiuj verketoj estis la unuaj lab. E eldonaĵoj. Tamen la asocio, kiu akceptis kiel membrojn nur personojn kaj lokajn grupojn, ne trovis multe da adeptoj ekster Francujo. La ĉefa kaj germana LEA-oj ellaboris du

diferencajn projektojn de int. organizo; ambaŭ ceis kunigi la LEA-ojn en lab. E kongreso, kiu pritrakus la problemon, kaj kiu okazus samtempe kun la U. K. en Paris, 1914, ne eĉtoviĝis. Jam pli frue ĉe la U. K. en Geneve, Cambridge, Antwerpen, Kraków kaj Bern, la lab. partoprenantoj aranĝis apartan kunvenon, t. n. ruĝulan kongreseton. Ĉi tiuj ebligis konatiĝon kaj interŝanĝon de spertoj, sed ne havis praktikajn rezultojn. En 1911 UEA klopodis starigi lab. fakon, sed ne sukcesis. Generale la lab. E movado ĝis 1914 laboris ĉefe por E.

Kelkaj el la agantoj sur int. kampo ankoraŭ ne nomitaj: P. Asselin, G. Bastide, E. Chapelier, (mortis en 1933), N. P. Evstifejev, E. Hakanson (mortis en 1907), J. Hoyle, H. Hyams (Tagulo), D. A. Klagin (mortis en 1929), W. Padfield, A. Panlou, E. Parker, V. Richard, Sifo (eldonis: La voĉo de la popolo, en ĉina kaj E lingvoj, mortis en 1915), W. Thielking.

Dum la mondmilito la lab. E movado stagnis. En 1919 ĝi reekvivis. En tiu jaro grupo da francaj lab. E-istoj, inter kiuj E. Lanti, faris la unuajn paŝojn por restarigi la int. kontakton. Reeldoninte la gazeton »Le Travailleur E-iste«, ili aperigis en ĝi int. rubrikon sub la titolo »E-ista Laboristo«, kiu post mallonga tempo elkreskis al memstara monata gazeto. Plie ili revivigis la asocion Liberiga Stelo kaj konformis ĝian statuton al la novaj cirkonstancoj.

En E-ista Laboristo la redaktoro, Lanti, publikigis serion da artikoloj, poste eldonitaj kiel broŝuro sub la titolo For la Neŭtralismo, en kiu li detale pritraktis la organizan demandon kaj konkludis 1. ke E por laboristoj ne estas celo, sed rimedo, 2. ke tial la lab. E-istoj devas organizi sin tute memstare, 3. ke necesas ne nur propagandi, sed ankaŭ uzi, apliki la lingvon, 4. ke la lab. E-istoj ne devas organizi sin en speco de Internacio kuniganta la naciajn asociojn (LEA-ojn), sed ke ili devas interligiĝi unu kun la aliaj senpere en mondorganizo sennacieca.

Ĉi tiuj ideoj renversis multajn el la ĝistiamaj perceptoj pri la tutmonda

organizado, tamen iom post iom ilin akceptis la plej aktivaj kaj plej klarvidaj lab. E-istoj. Liberiga Stelo gajnis membrojn en multaj landoj kaj la kreskanta influo de E-ista Laboristo, kiu depost okt. 1920 estis ĝia oficiala organo, plifortigis ĝian pozicion. En aŭg. 1921 okazis en Praha ĝia unua kongreso kun preskaŭ 80 partoprenantoj de 15 nacioj: inter ili estis: L. Banmer, K. Deubler, Guiheneuf, P. Köckeritz, Lanti, L. Revo. Laŭ decido de ĉi tiu kongreso Liberiga Stelo alinomiĝis Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kaj ĝia organo Sennacieca Revuo (S. R.). La gvidadon oni komisiis al la ĝistiam estraro de L. S., kies ĉefaj funkciuloj estis: Banmer, sekr., L. Glodeau, kas. kaj adm., Lanti, red. kaj gvidanto. La celon de la asocio oni formulis jene:

a) utiligi praktike la int. lingvon E por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda; b) kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de homeca solidaro; c) lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj; ĉ) servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT; d) peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealon de la asocio.

Ĉi tiun difinon oni akceptis en la fonda kongreso de SAT en 1921, ĝi restis ĝis nun valida. En 1928 oni pliprecizigis la celon per jena aldono:

SAT, ne estante politika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.

Unuvorte, SAT celas, per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado; helpadi

al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj juĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias la plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo. La membreco de SAT estas individua; lokajn aŭ landajn sekciojn ĝi ne havas. Karakteriza trajto el la organizformo de SAT estas, ke ĝia gvidinstanco, nun nomata Ĝenerala Konsilantaro, elektata de la tuta membraro, ne reprezentas landojn aŭ naciojn, sed t. n. sektorojn. Por eviti naciisman influadon en la gvidado oni dividis la tersurfacon laŭ arbitraj partoj: sektoroj (nun laŭ meridaniaj horzonoj) kaj po unu reprezentanto de ĉiu sektoro konsistigas la konsilantaron. Ĉi tiu elektas inter si la estraron de la asocio, kiun ĝi helpas kaj konsilas. De 1933 ankaŭ la estraro estas elektata de la tuta membraro kaj estos en la konsilantaro ankaŭ reprezentantoj de la LEA-oj, kiuj subskribis la Konvencion-kun SAT, (v. poste).

En 1922 aperis unuafoje la Jarlibro, kiu enhavante la adresojn de ĉiuj membroj, ebligas al la SAT-anoj interrilati unu kun la aliaj kaj efektive reciproke servadon, al kiu devigas la SAT-membreco. Sekvintan jaron SAT havis jam pli ol 2000 membrojn. S. R. eliris regule kaj kreskis laŭ amplekso kaj kvalito. La plimultiĝo de la administra laboro necesigis dungi salajratan oficiston. Ĉi tiun funkcion ekplenumis en la mezo de 1923 R. Lerchner, Leipzig. En 1924-25 la membronombro estis 2404, 2705. Tiutempe estis malpermesite al SAT-anoj esti membro de t. n. neŭtralaj E organizoj, ekde 1925 la tiurilata statutartikolo estas malpli severa.

En 1923 kelkaj Moskvaj fervoruloj, G. Demidjuk, N. Futerfas, S. Ĥajdovski, N. Nekrasov, eldonantaj revuon »La Nova Epoko«, kies enhavo montris ideologian parencecon al SAT, konsentis rezigni pri ties aperigo kaj redakti Lit. Sciencan aldonon de S. R. Ĉi tiu aldonon aperis unu

jaron. Tiam montriĝis, ke ĉi ambaŭ organoj ne sufiĉis. En okt. 1924 aperis semajna gazeto Sennaciulo (Sulo) kaj S. R. mem iĝis lit.-sciencia organo. En 1928 S. R. alinomiĝis La Nova Epoko; redaktoroj estis Nekrasov kaj Demidjuk kaj de 1930 Barthelmess. De 1924 la revuo ankaŭ havis pedagogian fakon, kiun prizorgis M. Boubou kaj J. Zilberfarb.

Kunlaborantoj de la SAT-organoj estis i. a.: L. Bergiers, G. P. de Bruin, J. Burger, E. Drezén, K. Fröding, D. Dambe, Emba (ps. de E. Baranyai), L. Ivn, J. Jurista, K. Johanson, N. Krassovski, M. Krjukov, Lanti, C. F. Magashazi-Hochhäuser, E. Mihalski, H. Muravkin, M. Muribo, Neniu, H. Remers, L. Revo, V. Riedel, S. Rublev, G. Saville, Mark Starr, E. Spiridoviĉ, Senheredigito (ps. de P. Kökeritz), Stebek, H. Weinhengst.

Tria gazeto estis »La Lernanto«, aldono de S-ulo kaj de kelkaj LEA-organoj, kiu en 1928-30 havis la eldonkvanton de 10.000 e-roj. En 1930 eliris Sennacieca Pedagogia Revuo, red. H. Stay, presata en Moskvo. Eliris nur 4 n-roj (148 p.).

Por progresigi la eldonadon de literaturo, starigis en 1922 Eldon-Kooperativo, komence gvidata de Barthelmess kaj Remers en Düsseldorf, poste transformita en fakon de SAT sub prizorgo de la SAT-estraro. Per eldono de akcioj ĝi havigis al si malgrandan kapitalon kaj sukcesis en deko da jaroj aperi pli ol 50 diversajn verkojn, el kiuj la plej gravaj estas: »Faŭsto« de Goethe, 1-a parto, trad. Barthelmess, »Eklumo en abismo« de Barbuse, trad. Else, »Je la nomo de la vivo«, originalo de Izgur, »Kandid« de Voltaire, trad. Lanti, »Ruĝa Stelo« de Bogdanov, trad. kolektivo, gvidis Nekrasov kaj Rublev, »La fera kalkanumo« de London, trad. Saville, »Komunista Manifesto« de Marks kaj Engels, trad. Pfeffer, »Ŝtato kaj Revolucio« de Lenin, trad. Demidjuk, »Naciismo«, originalo de Lanti, »Etiko« de Kropotkin, »ABC de Sennaciismo«, originalo de Elsudo (Kolĉinski), »Proletaria Kantaro« (74 kantoj kun notoj), »La Laborista E-ismo« de Lanti. Ĉi lasta verko jam aperis en angla, franca,

ĉeĥa, germana, nederlanda kaj sveda lingvoj. — Apartan mencian meritas la Plena Vortaro, verkita de prof. E. Grosjean-Maupin, A. Esselin, S. Grenkamp-Kornfeld, kaj prof. G. Waringhien, sub gvidado de la unue nomita. Por organizi la literaturan laboron starigis Lit. Komisiono (poste Lit. Sekcio), kiun gvidis sinsekve Barthelmess, Rublev, kaj Baranyai.

Ne ĉiuj SAT-anoj konsentis pri la taskoj de SAT, pri ĝia starpunkto, organizformo, taktiko ktp. Sekve de tio aperis kelkfoje proponoj pri ŝanĝoj en statuto. Plej radikala tia propono estis tiu de kelkaj sovetaĵ SAT-anoj, inter kiuj E. Drezén, A. Jodko, N. Incertov, B. Modenov, P. Robicsek, pri aliĝo de SAT al la Komunista Internacio. Kiam en la kongreso en Cassel (1923) montriĝis, ke ĝi ne havis ŝancon esti akceptata, oni reprenis ĝin. Ĉi sama kongreso rekomendis la starigon de fakoj (sekcioj) kaj frakcioj, por ebligi praktikan laboron en fakaj, profesiaj kaj partiaj rondoj. Starigis iom post iom sekcioj de edukistoj, gejunuloj, sportuloj ktp. La plej aktivaj sekcioj disponis pri propra »Paĝo« en la asocia organo. Speciale la Edukista Sekcio, gvidata de M. Boubou, faris gravan kaj modelan laboron. La frakcioj ĉefe laboras por kaj per E en partiaj rondoj kaj instancoj. Ekzistis anarkiista, komunista, sennaciista kaj socialista frakcioj.

En 1924-25 SAT travivis malgrandan krizon. Anarkiistaj SAT-anoj, inter kiuj J. Migny, A. Bolle, A. Lewin, malaprobantaj, ke en SAT-organoj ne povas aperi artikoloj kontraŭ Sovetio kontraŭ la komunismo, starigis propran organon, la Tutmondan Ligon de E-istaj Senŝtatanoj (TLES) kaj eldonis dumonatan gazeton »Libera Laboristo«. S-ulo, la oficiala organo de SAT, ĉefe pro la tre aktiva kunlaboro de komunistaj kaj sovetaĵ SAT-anoj kaj pro manko de alitendencaj kunlaborantoj aspektis iom unutendenca kaj kaŭzis malkontentecon ĉe parto de la SAT-anaro. Krome estis en SAT bataleto sur lingva kampo pro la troa uzado de novaj vortoj kaj de sciencaj afiksoj, kaj pro la eksperimentado kun novaj formoj kiel

»morge« (morgaŭ), »balde« (baldaŭ), »konfero« (konferenco), »difero« (diferenco) k. s.

Ĉi tiuj faktoj kaŭzis ian maltrankvilon ĉe la anoj, kiu esprimiĝis per multaj proponoj pri reorganizo, pri aliigo de la strukturo ktp. La kongreso en Wien, 1925, pritraktis ĉi tiun situacion, fiksas la ĝustan linion kaj restarigis la ekvilibron. Ĝi ankaŭ malaprobis la eksperimentadon kun lingvaj novaĵoj en SAT-organoj. Post tiu ĉi kongreso la redaktadon de S-ulo prizorgis redakcia komisiono, konsistanta el diverstendencaj SAT-anoj en Leipzig. Tio daŭris ĝis la mezo de 1926, kiam Lanti dum kelka tempo provizore prizorgis la redaktadon. Post malagrablaj spertoj kun aliaj redaktoroj, fine Barthelmess venis Parizon kaj de tiam ĉi tiu, sub gvidado de Lanti, redaktis S-ulon.

Ĉar ne estas eble el Sovetio rekte transsendi kotizojn kaj abonmonojn al la administrejo, funkciis tie kiel agentejo komence La Nova Epoko kaj poste la Centra Komitato de la Sovetrespublikara E-ista Unio (CK SEU). En 1926-27 SAT havis kelkajn malfacilaĵojn pro stagno en la montransendo el Sovetio tiel ke S-ulo povis aperi nur ĉiudekkvartage je 12 paĝoj. Monkolektado okaze de la kvinjara ekzisto de SAT helpis venki ĉi tiun krizon. En 1927 ekfunkciis Gazetar-Servo, gvidata de O. Bässler, kiu havigis informojn kaj novaĵojn al multaj naciaj lab. gazetoj. Dum unu jaro 1929-30 ĝi havis propran paĝon en S-ulo. En la dua jarkvino SAT progresis pli rapide ol antaŭe. En 1929-30 S-ulo aperis ĉrusemajne en 12 paĝoj; kiam eliris ĝia 300-a n-ro, ĝi havis pli ol 4200 abonantojn. Tiutempe la membraro superis la nombron 6500, el kiu ĉ. triono estis en Sovetio. Cetere en tiu nombro ne estas enkalkulitaj la membroj en Hungario, Italujo kaj Rumanujo, kie estas malpermeitaj esti membro de SAT. Komparante la membronombrojn de la plej gravaj landoj kun tiuj de la LEA-oj, oni konstatas, ke en 1929-30 en Aŭstrujo la nombro de SAT-anoj estis preskaŭ 20% de la kvanto da LEA-anoj, (270-1400), en Francujo iom pli ol 40% (370-850), en

Germanujo 50% (1800-3500), en Nederlando 40% (140-350), en Sovetio 50% (2000-4100), en Svedujo 20% (220-1060). Tute alia estis la proporcio en Britujo, tie estis 426 SAT-anoj kaj 160 LEA-anoj.

En la komenco estis malmultaj rilatoj inter SAT kaj LEA-oj. Unuflanke kelkaj LEA-oj preferantaj int. organizadon ne tre simpatiis al SAT, aliflanke SAT ne multe okupis sin pri farto kaj agado de la LEA-oj. Simpatiis al SAT la franca kaj germana LEA-oj, pli malpli pasivaj estis la aŭstra kaj sveda. La nederlanda ĝis 1928 forte kontraŭstaris al SAT, ĉe faris klopodojn por starigi Internacion. Tute apartan pozicion okupis SEU, kiu faris rezervojn pri la starpunkto kaj ideologio de SAT, sed tamen provizore subtenis ĝin kaj servis kiel peranto inter SAT kaj sovietiaj E-istoj.

En 1927-28 la estraro de SAT interrilatis kun la LEA-oj por trovi komunan bazon por kunlaboro. Sekve de tio estiĝis t. n. »Konvencio«, kiun aprobis la kongreso en Göteborg kaj kies ĉefa enhavo estis la jena: la LEA-oj prizorgas la por-E-an laboron kaj SAT la per-E-an, LEA-oj eldonas nacilingvajn kaj dulingvajn publikajojn kaj SAT la E-lingvajn, en lokaj grupoj estu starigataj SAT-rondoj, kiuj prizorgas la SAT-laboron, kaj SAT-propagandon, LEA-oj donas al SAT spacon en siaj gazetoj, kaj SAT faras la samon al LEA-oj, LEA-oj povas elekti unu el siaj estraranoj kiel konsultantan membron de la SAT-gvidantaro.

Iom post iom preskaŭ ĉiuj LEA-oj subskribis la konvencion. Montriĝis tamen, ke ĝi ankoraŭ ne prezentas idealan solvon por la problemoj pri kunlaboro inter SAT kaj LEA-oj kaj la germana kaj sovietia LEA-oj rompis ĝin en 1930 per sia kontraŭ SAT-agado.

Grava perioda okazaĵo en la SAT-vivo estas ĝia ĉiujara kongreso. Ĝi donas la eblon de fruktodona interŝanĝo de opinioj, spertoj, ktp. inter diverslandaj SAT-anoj kaj prezentas por multaj membroj la solan okazon por parola interrilato kun alilandanoj, krome ĝi estas impona prop. manifestacio, montranta la forton de

la lab. E-movado kaj la praktikan uzoblon de la lingvo.

En la unuaj jaroj oni alte taksis la moralan apogon de eminentuloj. Oni sukcesis atingi, ke famaj homoj akceptis la honorprezidon de la unuaj SAT-kongresoj kaj esprimante sian favoran opinion pri E, ili havigis al la E-istaro valoran prop. materialon. Ili aj eldiroj aperis tradukitaj en multaj naciaj gazetoj kaj estis legataj de centmiloj da homoj.

Tempo, loko kaj decidoj de la SAT-kongresoj estis la jenaj:

1921, 1-3 aŭg. Praha. Honorprez. H. Barbusse. Ĉ. 80 partoprenantoj el 15 landoj. Malakceptis neŭtralecan starpunkton, akcentis la neceson praktike uzadi E-n por lab. celoj.

1922, 12-16 aŭg. Frankfurt a. M. Honorprez. Romain Rolland. 230 el 12 landoj. Malpermesis al SAT-anoj esti membro de neŭtrala E-organizo.

1923, 11-15 aŭg. Cassel. Honorprez. A. Einstein. 250 el 18 landoj. Propono pri komunismo de SAT. Malaprobis ĉiun emon enŝovi en SAT batalon inter diversaj tendencoj.

1924, 14-18 aŭg. Brussel. Honorprez. Ernst Toller. 90 el 14 landoj. Malpliseverigo de la statuto. Rekomendo uzi simplan stilon.

1925, 11-15 aŭg. Wien. 150 partoprenantoj el 7 landoj. Decidis, ke SAT restos ĉiutendenca, per-E-a organizo. Malaprobis la tendencon eksperimenti en SAT futurisman, nefundamentan stilon. Starigis komisionon por SAT-programo.

1926, 6-10 aŭg. Leningrad. Honorprez. Lunaĉarski. 400 el 14 landoj. Raportoj pri »E en lernejoj kaj lab. kluboj«, »E kaj radio«, »Int. Lab. Korespondado« k. a. Rekomendo starigi lokajn SAT-grupojn. Tezoj pri rilatoj inter LEA-oj kaj SAT. La sovetia poŝto aperigas SAT-poŝtmarkon.

1927, 12-16 aŭg. Göteborg. Pli el 400 el 24 landoj, inter kiuj deko da sovetianoj. Akceptis la Konvencion inter SAT kaj LEA-oj kaj aldonon al la statuto, per kiu estis akcentata la kultura, eduka, nepolitika kaj kontraŭdogmeca karaktero de SAT.

1929, 4-10 aŭg. Leipzig. 650 el 22 landoj. Kritiko de komunistaj SAT-anoj pri la laŭ ili oportunistama, neklas-

batala gvidado de SAT, kaj pri laŭ ili malaprobinda eldono de broŝuro La Laborista E-ismo. Decido, ke aktivaj memb.oj devas aboni la oficialan organon de SAT. Likvido de la Programkomisiono.

1930, 3-7 aŭg. London. 340 el 16 landoj. Sovetiaj SAT-anoj bojkotas la kongreson per laŭdire intenca neĉesto. Batalo inter komunistaj partianoj unuflanke kaj la SAT-gvidantaro kaj ĝiaj aprobantoj aliflanke.

1931, 1-8 aŭg. Amsterdam. 400 el 14 landoj. Partiana opozicio klopodas akiri la gvidadon de SAT, sed malsukcesas. Ĝi forlasas la kongreson. Decido, ke SAT restos senpartieca, ĉiutendenca.

1932, 6-11 aŭg. Stuttgart. 245 el 12 landoj.

1933, 5-10 aŭg. Stockholm. 509 el 15 landoj.

1934, 3-8 aŭg. Valencia. 376 el 13 landoj.

Organizo kun preskaŭ 7000 membroj eldonante 3 gazetojn, aperiginte ampleksan kolekton da diversspecaj verkoj, kaj organizante ĉiujare sukcesan int. kongreson, estas jam rimarkinda faktoro en la E-movado. Pli kaj pli oni agnoskis ĝian gravan signifon. Sed ankaŭ ekster la E movado efikas ĝia agado. La servoj de SAT sur la kampo de interligo de diversnaciaj laboristoj kaj lab. organizadoj, la int. korespondado, la multa grava materialo liverita de SAT al diversaj lab. gazetoj, ktp. konvinkis parton de la gvidantoj pri la praktika utilo de E.

Sekve de tio kelkaj organizoj mem ekuzis la lingvon. La Int. Transportlaborista Federacio (ITF), kies sekr. Nathans mem estas E-isto, aperigas monatan gazetarsciigon en E. La Int. Laborista Olimpiado ankaŭ uzis E-n por siaj eldonaĵoj. La Internacio de militrezistantoj aperigis en E revuetojn kaj kelkajn broŝurojn. La Internacio de Socialista Kunbatalo (ISK) publikigas trimonatan revuon en E. Ankaŭ la Int. Lab. Asocio kaj la Int. Antimilitista Oficejo eldonis sciigojn en E. En Sovetio la Unio de Militantaj Ateistoj, la Profesia Unuiĝo de Eduklaborantoj, la Profesia Unuiĝo de PTT-Laborantoj, la revuo Vojo de Klerigo aperigis eldonaĵojn en E. Krom tio

sennombraj aliaj sovetiaj organizoj, fabriakaj komitatoj, gazetredakcioj, ktp. per E interrilatas kun alilandaj lab. organizoj.

Dum ĉ. 20 jaroj la lab. E movado estis, tiel sur nacia kiel sur int. kampo, pli malpli unuece organizita. Ĉi tiu situacio ekaliĝis en 1930, kiam la germana LEA en sia kongreso en Essen ŝanĝis sian senpartiecan bazon kaj alproksimiĝis al la komunista tendenco. Sekve de ĉi tio parto de ĝiaj membroj forlasis la asocion kaj starigis la Socialistan E Asocion (SEA); alia parto restis sen nacia kunligo. Proks. samtempe komenciĝis en SAT opozicio kontraŭ ties gvidantaro, precipe kontraŭ Lanti kiun oni akuzis pri revizio de SAT-principoj, pri atakoj al Sovetio, pri, prop. de reakcia teorio de sennaciismo ktp. Staflanke la SAT-direkcio argumentis, ke ĝuste la opozicio revizias la SAT-principojn trudante al SAT politikajn taskojn, kiujn ĝi laŭstatute ne havas, ke ĝi per sia agado malutilas al Sovetio kaj ke la sennaciistoj, kiuj agnoskas la klasbatalon, laŭstatute havas la rajton esprimi siajn ideojn en SAT.

Ĉi tiun konflikton pliakrigis la fakto, ke jam de kelka tempo ne plu okazis transpagoj de SAT-mono al SAT. Tiel amasiĝis ĉe CK SEU. ĉ. 12.000 germ. markoj. Laŭ CK SEU ne eblis transsendi ĉi tiun monon pro la financaj aranĝoj de la registaro. Sed la SAT-direkcio dubis, ĉu tio estis la kaŭzo, almenaŭ la sola kaŭzo. Ĝi konstatis, ke CK SEU neniel klopodis malpliigi la ŝuldon al SAT per presiĝo de SAT-verkoj en Moskva, kion la direkcio plurfoje instrukiis al ĝi. En la 10-a SAT-kongreso, London 1930, kiun ne ĉeestis sovetiaj SAT-anoj, la opozicio forte atakis la SAT-direkcion. Tamen la plimulto aprobis la direkcion gvidadon.

Je la sama tempo okazis en Moskva kunveno de CK SEU, kiun ankaŭ ĉeestis 2 estraranoj de la germana LEA. Ĉi tiu kunveno decidis eldoni int. gazeton, starigi eldonejon de revolucia E literaturo (EKRELO) kaj prepari kongreson de revoluciaj E-istoj. La gazeto, nomata »Internacisto« jam baldaŭ eliris. En ĝi aperis i. a. alvoko de la t. n. Interliga Oficejo de la klas-

batala SAT-opozicio, instiganta al bojkoto de SAT-eldonaĵoj, nepagado de kotizo ktp.

Defendante SAT kontraŭ tiuj agadoj, la Plenum-Komitato laŭ propono de la kontrolkomitato, eksigis la skribintojn de ĉi tiu alvoko. Dume SAT ne ricevis siajn 12.000 markojn deponitajn en Moskva. Ankaŭ poste kiam eblis transpago monon al la Moskva filio de la presejo de S-ulo, oni ne faris tion. La SAT-anaro ege indignis pro la reteno de la mono ŝuldita al SAT pro liveritaj libroj, gazetoj ktp. La opozicio defendis sian agon argumentante, ke ĉi tiu mono ja apartenis al sovetiaj SAT-anoj, kiuj ne aprobas la taktikon de la direkcio. Cetero SAT liveris por ĉi tiu mono librojn, gazetojn ktp. al sovetianoj, do la mono apartenis al ĝi. La samon oni povas diri pri la stoko da SAT-libroj, pli frue presitaj en Moskva, kiun SEU proprigis al si.

En Amsterdam 1931 okazis la lasta decida batalo. Post kelkaj tumultaj kunsidoj, la opozicio konstatante, ke la plimulto ne estas ĉe ĝia flanko, forlasis la kongreson. Poste okazis voĉdono pri la raportoj de la direkcio. Aprobis ilin 105 voĉoj, kontraŭ 6 kun 6 sindetenoj. Pli poste referendumo inter la tuta membraro aprobis la agadon de la direkcio kun 887 voĉoj por kaj 171 kontraŭ.

Post la skismo en SAT la opozicio, sub la nomo Int. Unuiga Komitato koncentris sian agadon al la konkero de la naciaj asocioj. Sekve de tio en kelkaj landoj la LEA-oj disiĝis. Krome ĝi klopodis starigi LEA-ojn en landoj, kie ili ankoraŭ ne estis, por krei bazkolonojn por la starigota internacio. En aŭg. 1932 okazis en Berlino la fonda kongreso de la Internacio de Proleta E-istaro (IPE), kiun ĉeestis, laŭ raporto en Int-isto, 348 personoj el 11 landoj. En la estraro oni elektis: Kissler, ĝenerala sekr., A. Schwenk, Schwarz, Wiebach, H. Muravkin. Sidejo: Berlino. Celo: Servigi E-n al la klasbatalo de la tutmonda proletaro kaj al la socialisma konstruado, unuigi, organizi kaj gvidi la lab. E movadon sur bazo de revolucia klasbatalo, de proleta int-ismo, evoluigi kaj pliriĝigi la teorion, teknikon

kaj aplikon de la lingvo. Int-isto red. Batta, poste Schwarz (aŭ Schwenk?) iĝis oficiala organo de IPE. Krome IPE eldonis revuon La Nova Etapo, kiun redaktis N. Nekrasov. EKRELO, kiu jam aperigis konsiderindan kvanton da verkoj, ĉefe kun komunista tendenco, iĝis la oficiala eldonejo de IPE.

Laŭ la gvidrezolucio, akceptita en ĝia fonda kongreso, IPE estas ideologie bazita sur la marksista mondkoncepto, la dialektika materialismo. Ĝi kontraŭbatalas la oportunisman sennacismon kaj ankaŭ »la reformisman ideologion de la socialdemokratio subtenantaj la imperialismajn rabadojn kaj militojn, kiuj plenumas la taskon deteni la laboristojn de la klasbatalo kaj malhelpas la efektivigon de la ruĝa unueca fronto«. La diferenco inter SAT kaj IPE estas, ke SAT volas kunigi ĉiujn lab. E-istojn klasbatalajn kaj meti E-n je la servo de ĉiuj klasbatalaj organizoj, ke en IPE nur estas loko por komunistaj aŭ komunistemaj E-istoj, kaj ke ĝia agado speciale rilatas al komunistemaj organizoj, ke SAT akcentas la kulturen, klerigan, edukon laboron kaj IPE la politikan, agitecan, ke SAT havas organizformon sennaciecan bazitan sur individua membreco kaj ke IPE estas int. organizo, kies bazo estas la naciaj sekcioj: la LEA-oj.

Perdinte, per la skismo relative grandan kvanton da membroj, precipe sovetiaj, (ĉi tiuj pro la agado de CK SEU eĉ ne povis resti membroj de SAT, se ili volis tion), perdinte grandsuman monon, grandan stokon da libroj, kiujn CK SEU ne redonis al ĝi, SAT grave malfortigis. La kreskanta ekonomia krizo ankoraŭ plimalbonigis la situacion. Kiam la antaŭa presejo de SAT-organoj postulis tujan pagon de granda monsumo, tio preskaŭ bankrotigis la organizon. Nur dank' al grava financa helpo de kelkaj SAT-amikoj SAT venkis ĉi tiujn malfacilaĵojn. En 1933 S-ulo iĝis monata oficiala organo kun aldono La Lernanto kaj anstataŭ La Nova Epoko elirinta dumonate dum 1932 reekvivis monata Sennacieca Revuo. La starigo de faŝisma reĝimo en Germanujo kaŭzis novajn malfacilaĵojn al

SAT kaj i. a. necesigis la transigon de ĝia administrego al Paris. Krome la SAT-vivo en Germanujo estis tute malebligata.

Dum la SAT-kongreso en Stuttgart, 1932, estis propono pri ŝanĝo de la sennacieca organizformo de SAT en internacian. Ĉi tiu propono ne estis akceptita. Pro tio ĉi la Aŭstria Laborista Ligo E-ista en 1933 iniciatis starigi Internacion de Socialistaj E-istoj (ISE). Kvankam ALLE siatempe subskribis la Konvencion de Göteborg, ĝi neniam agis laŭ ĝi. El ĝia organo La Socialisto ĝi faris pli malpli int. gazeton. Ĝi altiris al si la hungaran kaj ĉeĥoslovakajn LEA-ojn kaj kun ili starigis supre nomitan Internacion, kaŭzante per tio novan skismon en la lab. E-movado. Sed ankaŭ la sekvoj de ĉi tiu bato SAT sukcesis venki. Regule eliris ĝiaj 3 gazetoj, aperis novaj libroj, i. a. la dua eldono de Plena Vortaro, J. Hašek, Aventuroj de la brava soldato Svejk, J. London, Jimmy Higgins, okazis sukcesaj kongresoj ktp. De la Stockholma kongreso E. Lanti, kiu de ĝia fondo estis gvidanto de SAT kaj kun grandega sindono kaj kapablo plenumis tiun funkcion, rezignis pri sia posteno. Anstataŭe oni elektis H. Platiel. De tiam la direkcio de SAT estas jena: H. Platiel, prez., L. Devarennes, vicprez., L. Banmer, admin. sekr., Barean, helpsekr., N. Barthelmes, red., F. Paquier, helpprotokolanto.

Aktivuloj, iamaj kaj ankoraŭaj, ne jam menciitaj: S. Aarse, E. Adamson, van Aelst, L. Avid, J. W. J. Benjamin, P. Barreira, A. Barrot, J. S. Borel, E. Eriksson, W. Fedorski, A. von der Heid, K. Hubricht, J. Johansson, W. Kampfrad, J. M. Kerr, E. K. Limouzin, Nikolski, Polakov, C. Richter, M. Roux, C. Roux, D. Snejko, H. Stay, C. W. Spiller, Waldmann, Th. Weder, A. Wendt, W. Wildebrand.

Noto. La artikolon tralegis E. Lanti. (v. kaj komp.: ISE kaj Proleta movado.) G. P. de BRUIN

La Botistoj. Komedio en kvin aktoj verkita de A. Kivi, el la finna trad. Hilma Hall. 1919, 142 p. »Amuzaj cirkonstancoj, komikaj res-

pondoj, simpleco de P' vilaĝaj moroj. Sperta tradukisto.» (G. S. ,E', 1920, p:34.)

Lacalendola (lakalendola) Adam, italo, prof. de la albana lingvo; li instruis ankaŭ la japanan, rusan, germanan kaj hispanan lingvojn. Fondinto de la E-movado en Suda Italujo (Apulio). Komencis instruadi E-n en Bari en 1919. Fondis en 1920 la Akademion Balkanan E-istan, kiu atingis grandan prosperon kaj sendis la plej bonajn lernantojn al UK-j. Li fondis kaj direktis la revuon *Corriere Balcanico E-ista*, kiu tre efikis por la prop. en Apulio. Pro lia agado E estis enkondukita en 1924 en 8 lernejoj de Bari, en unu el ili (Arkiepiskopa Seminario) kiel deviga instruado. En 1925 kune kun d-ro Koch li estris IEF kaj organizis italan E-kongreson en Bari.

La Cikoni-kalifo. Romano de M. Babits, el la hungara trad. de Bó. 1929, 187 p. »Historio de duviva junulo, (bela, sana, talenta, riĉa), kiu estas premata de sinsekvaj inkubsonĝoj, vivante en ili la malnoblan vivon de mizera trompanto kaj murdanto kaj fine pereante pro tiu ĉi fatala duoblo de sia vivo. La tradukinto absolute disponas pri la tuta esprimkapablo de E.« (Kopar, Hungara Heroldo, 1929. B. 6.)

La Colla Stefano, italo, arkivisto, paleografo, red. de »Enciclopedia Italiana« en Roma. Nask. en 1889 en Salemi (Trapani) E-isto de 1906 (lernanto de Nalli). Fondis en 1907 kune kun G. Castiglia kaj E. Monreale (nuna korespondanto de la ĵurnalo »Popolo d' Italia«) la asocion »Junulara Amikaro E-ista«, kiu en 1908 iĝis EG de Palermo. Honora membro de UEA, ties delegito en Palermo dum 20 jaroj. Red. de *Notizie E-iste* kaj *E-isto*, 1907—10. L. K. de 1925. Redaktas la monatan aldonon de HDE: *Lingva Kritiko*. Speciale interesiĝas pri I-E vortaro.

Lacroix (lakrua) Paul, franco, komercisto, prez. de la Asocio por Komercio kaj Industrio en Grenoble. Unu el la kunfondintoj de SPPE, 1898. Per lia apogo okazis la unua prop. en Sudoriento de Fr.

Ladevèze René, franco, interpretis-

to de la »Hamburg-Amerika Linie«. Nask. 28 nov. 1885 en Ager (Franc.)-mortis mallonge antaŭ gefianĉigo kun Hamburg-a E-istino, 14 jul. 1913. E-isto de ĉ. 1905. Laŭ ekzemplo de Cart li instigis al E-aj ekzamenoj ankaŭ en Germanujo kaj kompilis *Demanderon* (v.), 1911. Gvidis kursojn, aranĝis kun d-ro Mybs E-ajn festojn, kiuj montris la gajan flankon de la mondlingvo per vorto, kanto kaj ludo. Estis sekr. de la Vegetara Ligo E-ista.

La Dormanto Vekiĝas. Romano de Wells, el la angia trad. Millward 1929, 210 p. »Multaĵoj el la antaŭdiraĵoj, faritaj jam antaŭ 30 jaroj, efektiviĝis; aliaj feliĉe ne. La traduko ĝenerale bona kaj komprenebla, tamen parte montras stilon malglatan.« (G. S. ,E' 1929, p:183.)

La Du Amatinoj. La kapricoj de Mariano. De Mussset, el la franca trad. Jan van Schoor. 1930, 112 p. La unua estas novelo kaj temas pri duobla amo de junulo, la dua estas teatraĵeto pri malfeliĉa amo tragikomika. Bona traduko.

La Esperantisto. La unua gazeto en E. La unua n-ro estis datita: Nürnberg, 1. Sept. 1889 kaj havis la titolon: »La Esperantisto. Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto. Sub la kunlaborado de Dr. Esperanto (Dro L. Zamenhof) eldonata de Chr. Schmidt, prezidanto de la klubo mondlingva en Nürnberg. Eliras unu fojon en la monato.« Ĝi estis 8 paĝa provnumero kaj enhavis artikolon »Prospekto« en germana, franca kaj E-a lingvoj, artikolon pri »E kaj Volapük« en germana, kaj E-a, versajon »Al la E-isto« kun germana traduko, fine bibliografian kaj anoncon pri aperontaj libroj. »Ĉe la fino de 1889 la gazeto havis 113 abonintojn, plejparte rusajn... LE tuj fariĝis plej efika centrigilo kaj kuragiĝilo inter la diverslandaj adeptoj, kiuj antaŭe havis kvazaŭ nenium alian ligilon ol sian korespondanton kun D-ro Z. La gazeto donas bonajn tekstojn, kiuj helpas pli profundan studadon de la lingvo, ĝi ebligas la aŭtoron de la lingvo doni ĝeneralajn klarigojn al ĉiuj per siaj »Respondoj al amikoj« kaj samtempe ĝi informadas pri la progresoj de E...

En 1890 LE entute transiris en la manojn de D-ro Z, sed nur tre malfacile kaj multekoste li povis aperigi la gazeton kun tiel malmultaj abonintoj. En aŭg. 1891 li proponas organizon de Akcia Societo E-ista... Ĉirkaŭ fino de tiu jaro la personaj cirkonstancoj de D-ro Z fariĝis tiel preman-taj, ke li trovis sin devigata forlasi la kondukadon de la tuta afero... Felice tiam aperis nobla, malavara savanto... W. H. Trompeter... Lia energio ebligis al li oferi la necesan sumon por subteni la tutan entreprenon de la gazeto ĝis 1894... En literaturaparto de LE aperis (en 2-a n-ro de 1895) traduko de verketo de Tols-toj 'Prudento kaj kredo'. Pro tio la rusa cenzuro malpermesis la eniradon de LE en Ruslandon, kie la gazeto havis la plej grandan parton de siaj abonantoj... La 5-6-a n-ro de LE (majo-junio 1895) estis la lasta de tiu organo, kiu dum ses jaroj estis la centro de la tuta movado. Dum sek-vantaj monatoj okazis komprenebla senkuraĝiĝo inter la E-istoj kaj eĉ ĉe ilia Majstro«. (Privat, Hist. de E, I, p: 44-55.) La lasta n-ro aperis fakte en aŭg. 1895. Entute eliris 66 n-roj. Nombro de la abonantoj en 1894: 717, el kiuj 60% estis ruslandanoj. (BIL, p: 306).

La Esperanto-Klubo. De E. Malmgren. 1934, 48 p. »Koncize kaj klare li pritraktas gravajn aferojn en la grupa vivo, donas instrukcion pri fondo de grupo kaj pri laboro de la funkciuloj.« (R., Svenska Arbetar E-isten, apr. 1934.)

La Espero. Poemo de Z. »La gvidanto parolas al siaj adeptoj kaj ankaŭ al tiuj, kiuj ne jam sekvas lian standardon, kaj montras al ili la logan bildon de l' estonteco.« (Artikolo de Behrendt en »Kongresa Jubilea Libro«, 1933.) v. Himno E-ista.

La Eŭropa Milito. Germanaj oficialaj raportoj E-igitaj. 31. aŭg. 1914 5 junio 1915. 29x22. Entute 151 flavaj folioj po 1 p. P. TARNOW.

La Evoluo de Telefonio. Originale de ing. Isbrücker, 1928, 62 p. »Resumas vorte kaj bilde, kion ĉiu devus scii pri la temo.« (G. S., 'E', 1929, p: 62.)

La Familio Gerak. De Elin Pe-

lin, el la bulgara trad. Atanasov. 1924, 83 p. »Tipa priskribo de vilaĝana moro kun temo pri maldolĉa disiĝo de familio. E-igo tre bona.« (G. S., 'E' 1924, p: 124.)

(La) Fanny. Romano de E. Ferber, trad. el la angla Berno Fabio. 1934, 240 p. »Leginda kaj rimarkinda studaĵo pri la vivo de juda knabino en Usono... Ĝi estas vigle kaj lerte rakontita.« (»The British E-ist«, 1934, p: 401.)

La Faraono. Romano de Prus, el la pola trad. Kabe, 1907-08, 630 p., dua eld. 1912. Scenejo: la antikva Egiptujo. Ĉeftemo: batalado inter la pastraro kaj la kronprinco, kiu volas akiri al si mem la plenpotencon. Priskribataj: moroj, eĉ la intima vivo de la egiptoj. Traduko: tute modela, klasika stilo. Unu el la plej famaj verkoj en E.

La Fera Kalkanumo. De London, el la angla trad. Saville. 1930, 362 p. »Ne vera romano ĝi estas, sed socia aŭ socialista pledado, en formo de memorlibro. Bona traduko.« (G. S., 'E' 1930, p: 182.)

La Fianĉiniĝo de Sovagulineto. Triakta komedieto, originale de Roksan, 1909, 31 p., dua eld. 1922, 47 p. »Amuza, vigla, senpretenda. Ĝia stilo estas tiel viva kiel la temo mem.« (G. S., 'E' 1923, p: 45.)

La Fina Batalilo. De T. W. Wilson, trad. el la angla. Novelo kontraŭ la militismo. 1916, 173 p.

La Firmao de la Kato, kiu pilkludas. De Balzac, el la franca trad. P. Benoit. 1924, 75 p. »La vivo, la movo ŝajnas preskaŭ foresti, anstataŭataj de longaj detalegaj priskriboj. Tamen... impresio de tre neta neforge-sebla bildo. Traduko tro laŭvorta.« (G. S., 'E' 1924, p: 188.)

La Floretoj de S. Francisko, E-igitaj de Pizzi. 1926, 174 p. »La itala originalo datas de la 13-a jarcento. La animo de Fr., lia amo al proksimumoj, lia rezigno... jen la bonodora parfumo de la Floretoj. Troviĝas tro komplikaj frazoj.« (G. S., 'E' 1926, p: 181.)

Lagerlöf-romano: Gösta Berling. El la sveda trad. S. Engholm. 1934, 568 p., kun ilustraĵoj. »Svedlingve ĝi aperis en 34 eldonoj kaj ĝi estas tra-

dukita en 37 lingvojn. En G. B. la aŭtorino majstre pentras ne nur la vivon en la bela provinco Vermlando kaj la tiajn bravajn, harditajn homojn, sed ŝi montras, kiel en ĉiu homo, eĉ la plej simpla, malriĉa kaj mizera, estas troveblaj bono kaj eĉ herocco, oferemo kaj amo. (El la prospekto.) Aliaj verkoj de L. aperintaj en E: »La mono de Sinjoro Arne«, »La infanoj de Betlehem« kaj »La junulino el Stormyr«.

La Gefratoj. Komedieto de G o e t h e, el la germana trad. G r a b o w s k i. 1889, 28 p., dua eld. 1909. La dua literaturajo trad. al E.

La Hirundlibro. De T o l l e r (kies verkojn oni bruligis publike en Germanujo), el la germana trad. H e l e n e W o l f f. 1930, 64 p. La poeto en fortikaja malliberejo. En la ĉelo paro da hirundoj eknestis, sed la neston la gardistoj ripete detruis. Liberaj, ne-regulaj versoj, kortusa liriko, bona traduko.

La Holanda Pioniro. Unue aperis en Hilversum. Red. Uitterdijk. 1-a jaro majo 1902—dec. 1903, 11 kajeroj (12 n-roj.) 11×IV+224 p. holande-E. 2-a jaro marto 1904—dec. 1905, 4 n-roj. 4×IV+113 p., nur E-e, ĉar la plejmulto de la abonantoj estis eksterlandanoj, 22×13—14. Pro malmulte da enspezoj ĝi devis ĉesi. En 1906 Uitterdijk, kiu de komenco estas la ruĝa fadeno en la holanda E-a movado, provis reaperigi LHP en Utreĥt, sed sen sukceso. Fine en okt. 1908 la ES »La Estonteco estas Nia« reeldonis en Amsterdam sub la red. de J. de Haan LHP, anstataŭante per ĝi »Amsterdamo Pioniro«, kiu a e is de aŭg. 1907—okt. 1908 regule. Ĝis sept. 1909 aperis 12 n-roj. 256 p. 23×16. De okt. 1909—1914 ĝi alprenis formaton de ĉiutaga gazeto, 4 p. 50×33 sub la redaktado de H. Block kaj de 1914—1923: 16 p. 14×16 sub J. Ziermans kaj poste H. C. Mees. De julio 1925—28 Hengel kaj Uitterdijk eldonis gazeton kun simila titolo, nome »Holanda E Pioniro« IV+12—16 p. 28×22.

P. TARNOW.

La Homa Lingvo. Originale de W. E. Collinson. 1927, 96 p. Enkonduko en la lingvosciencan. Titoloj de la ĉapitroj: La naturo de la lingvo.

Skizo de fonetiko. La bestaj krioj. La infana lingvo. Lingvaj ŝanĝoj. Disiĝo kaj unuigo. Fremdaj influoj. Lingvo kiel karakterizilo de la parolantoj. La klasifiko de la lingvoj.

Laĥovicki Pinhas. judo, ing.-arĥitekto. Nask. 8 sept. 1892 en Pinsk (Rusl., nun Pollando). UEA-del. en Jerusale. Iniciatis la unuan E-kongreson en Palestino (20 jan. 1934) en J., kaj la unuan E-ekspozicion en la Levantefoiro en Tel Aviv, apr.-majo 1934.

Laignier (lenje), Marcel, franco, advokato. Nask. 9 nov. 1881 en Reims. Unu el la unuaj francaj E-istoj, varbita en 1892 de Beaufront. Propagandis unue inter siaj kunlernantoj, partoprenis en la fondo de la ES Reims-Soissons, 1894, helpis por la fondo en Reims de EG de SPPE, 1901, gvidis kursojn, kunlaboris por la fondo de la Int. Societo de E-istaj Juristoj, reorganizis la grupon de Anney, 1920, kaj de Nancy, 1926. L. K. de 1930.

Laiho (lajho) Lauri Isak, finno, dir. de reklamfirmo. Nask. 19 jul. 1895, mortis 4 jan. 1932. Loĝis kelkajn jarojn en Aŭstralio, kie laboris i. a. kiel red. de anglalingva gazeto. Verkis finne libron pri Nova Gineo. Ĉiam gaja funkcianto en la Helsinka Societo »La Polusstelo«; faris mondonakon por la movado en F. Verkis kun aŭstraliano Delsudo: A ŭ s t r a l i o , l a n d o , k a j p o p o l o , kiu poste aperis ankaŭ finne en lia traduko.

(La) infanoj en Torento. Skizo de S. E n g h o l m. 1934, 116 p. »Li enigas la leganton en la medion de torentaj infanoj, kies malsamajn edukon kaj vivon ni kun streĉo sekvas... La stilo ĉiam klara kaj bona.« (»Svenska Arbetar E-istena«, sept. 1934.)

La Instruo de Karl Marks. Tezroj de Instituto de Marks-Engels-Lenin. 1934, 54 p. »La tezroj, koncize skizante la Marksisman laŭ vidpunktoj politika, ekonomia kaj filozofia, celas montri, ke la komunistoj estas la solaj fideluloj al la malnova ortodoksa instruo de Marks, kaj ke la ceteraj socialistoj estas »renegatoj«. La temo malebligas tre fluan stilon.« (J. Farrand, »The British E-ist«, aŭg. 1934.)

La Interligilo de P' PTT. Oficiala informilo de ILEPTO. Fondis en 1922

la fratoj Filliâtre, Paris. Formato 26.5×18.5. (v. PTT.)

La Interrompita Kanto. Verkis: Eliza Orzeszko, el la pola trad. Kabec. 1905, 2-a eld. 1908, 79 p. »Belega amarakonto, majstre tradukita.« (A. E. W. British E-ist, 1906, p: 54.)

Laisant (lezan) Charles, franco, matematikisto kaj politikisto. Nask. 1 nov. 1841 en La Basse-Indre (apud Nantes), mortis 5 majo 1920 en Asnières (apud Paris). Oficero ĝis 1876, sed jam de 1871 li interesiĝis pri la politiko. Deputito, red. kaj dir. de politikaj ĵurnaloj, li apogis la faman generalon Boulanger, kaj pro tio estis kondamnita. De 1893 li dediĉis sin nur al la scienco. Li verkis plurajn librojn pri supera matematiko. Varbita de Méray al E en 1900, li propagandis ĝin inter la scienculoj. Vicprez. de SFPE. Kunlaboris en kelkaj E-aj gazetoj, kaj verkis broŝurojn pri kaj en E. Vicprez. de la Pariza E G, 1901.

Lajarte (Dufaure de Lajarte) (dö lajart) René, franco, juristo kaj prefekteja oficisto. Skribis pri E en Parizaj ĵurnaloj, kunlaboris en multaj E-aj gazetoj. Sekr. de L. K., estis la helpanto de Cart por administro de LK (1924—1931). Poste prizorgis sola la funkciadon de la Lingvaj Institucioj (1931—1933). Kunlabore verkis kelkajn listojn de fakaj terminoj. Kolektis kunlabore kun Grenkamp: Vortoj de Prof. Cart, (1927). L. K. de 1925.

Lajos (lajoŝ) Gyula, hungaro, dir. de rom. kat. eklezia kantlernejo. Nask. 1 apr. 1877 en Villány. De multaj jaroj gvidanto de la movado en Pécs kaj prez. de la loka grupo.

La Juna Batalanto. Organo de la int. katolika junulara kaj paca movado, eld. de MOKA (v.), dumonata gazeto, red. nur en E. Ĝi fondiĝis en 1926 kiel daŭrigo de la antaŭa Junula Angulo en Katolika Mondo. En 1926—28 ĝi estis aldono al K. M. Ĝia tendenco estis internacieca, pacifista, sociala, vivreformista. En 1929, kiam K. M. malaperis, fondiĝis Eldona Kooperativo, por sendepende publikigi la gazeton. Redaktoro estis de la komenco d-ro W. Solzbacher, redaktejo kaj administrejo troviĝis an-

taŭe en diversaj lokoj de Germanujo (Honnef, Elberfeld, Werl, Köln) kaj estas nun en Luksemburgo. La librovendejo de la gazeto estas la plej komplete libroje de kat. E-literaturo. W. SOLZBACHER.

La junulino de Stormyr. De S. Lagerlöf, trad. el la sveda de S. 1930, 94 p. »Sentoplena rakonto pri amo kaj malfeliĉo de juna, brava knabino. La personoj estas prenitaj el la kampara popolo sveda.« (D-ro Gr., La Socialisto, 1930, p: 92.)

La Kapitanfilino. De Puŝkin, el la rusa trad. M. Sidlovskaja. 1927, 176 p. »Valora verko. Ĝi unue montras al ni la vivadon de la aristokrataj oficiroj kaj ties morojn. Poste ni vidas manieron de rusa ribelo, »sensenca kaj senindulga«, kiel diras Puŝkin. La traduko estas modela.« (g-K, La Socialisto, 1927, p: 72.)

La Karavano. Verkis W. Hauff, el la germana trad. J. W. Eggleton, 1910, 107 p., dua eld. 1921. »6 rakontoj el la oriento, iom similaj al la fabeloj de Milkaĵo unu noktoj. La tradukinto uzis facilan fundamentan stilon.« (G. S., E' 1922, p: 92.)

La Komerco. Oficiala bulteno de KEU (v.). Fondita en 1929. Aperas neregule. Formato 30×22.

La Konfeso. De L. Tolstoj, el la rusa trad. T. Tennner. 1911, 87 p. »Altscienca, pure filozofia verko. Temo porreligia. La stilo estas tre agrabla« (L. I. 1911, p: 528.)

La Konscienco Riproĉas. Rakonto de Strindberg, el la sveda trad. Backman. 1928, 60 p. »Dum la milito en 1870, sciencisto, prusa oficiro, estas devigata mortpafigi tri neregulajn soldatojn francajn; la konsciencoproĉoj lin frenezigas; fine resaniĝas kaj lia iama patriotismo cedas al pli nobla tuthomara sento. La traduko estas laŭdinda.« (G. S., E' 1928, p: 176.)

La Kontinuo. De Huntington, el la angla trad. Bricard. 1907, X. kaj 125 p. Elementa teorio starigita sur la ideo de ordo kun aldono pri transfinitaj nombroj. La unua grava matematika verko en E.

La Kreitaĵo Profitoj. Pulĉinela komedio de J. Benavente, el la hispana trad. Ingleda, 1932, 96 p. »Serio

da trompajoj, perfidajoj, tre lerte aranĝitaj». (G. S., E' 1932, p: 165.)

La Kurso de Andreo Ce. Tuta teksto laŭ vortvorte stenografitaj notoj de la Ĉe-kursoj en 1929, kun konsiloj kaj prikursaj informoj por la instruantoj. Mimeografiita. VIII kaj 143 p. Formato 23×29 cm. (v. Cseh-metodo.)

La Kvar Evangelioj kunigitaj en unu rakonto. De R. Laisney. 1908, 197 p. Aprobata de la katolika eklezio.

La Kvinjaro de Sovetlandoj. De Sosnowski, el la rusa trad. V. Polakov. 1923, 80 p. Ĝi per multaj bildoj kaj sugestaj tekstoj iom malkaŝas al ni la spiritstaton, kredon kaj iluziojn de niaj orientaj najbaroj. (G. S., E' 1923, p: 183.)

La Laborista Esperantismo. Verkis Lanti. SAT, 1928, 40 p. »Ĝi ne nur estas informilo por laboristaj E-istoj, sed ĝi estas iagrade ankaŭ sociologia studaĵeto, atribuanta al la SAT-movado specialan kulturhistorian signifon« (La Socialisto, 1929, p: 8.) Aperis ankaŭ en naciaj lingvoj.

La Lastaj Tagoj de D-ro L. L. Zamenhof kaj la funebra ceremonio. Eld. A. Oberrotman kaj T. Jung, 1921, 48 p., kun ilustraĵoj. Artikoloj, paroladoj, poemoj de diversaj aŭtoroj.

La Leono de Flandrujo. Romano de Conscience, el la flandra trad. Bulthuis. 1929, 311 p. »Ampleksa historia romano, potenca multkolora bildo, vera popola eposo. Tre belajn paĝojn ĝi enhavas kaj ne duba estas en ĉi tiu verko kiel en multaj aliaj la merito de P tradukinto, kiu klopodis por verki bele kaj korekte.« (Akademia Raporto, 1930.)

La Malgranda Johano. De Eeden, el la holanda trad. Bulthuis. 1926, 184 p. »Fabelo por maturuloj. Per simplaj rimedoj la aŭtoro kreis poeziplenan bildaron; lian harmonian stilon la tre lerta tradukinto havigis al la E-a teksto.« (G. S., E' 1926, p: 181.)

La Malsanulo pro Imago. Komedio de Molière, el la franca trad. W. Velten, 1911, 98 p. »La traduko ĝenerale estas bonega, kaj bone reproduskas la klaran, precizan kaj elegantan stilon de M.« (R. M., La Ondo de E, 1912, p: 30.)

La Malŝparulo, teatraĵo de F. Raimund,

el la germana trad. Zwach, 1924, ludita dum la UK en Wien, 1926, 97 p. Amuza enhavo, lerta traduko.

Lambert (lanber) Charles, franco, univ. prof. ĉe la lit. fakultato. Nask. 9 febr. 1866 en Mouzon (apud Sedan.) E-igis en 1899 hazarde, leginte gramatikon de Beaufrant. La 10 jan. 1900 faris en la Universitato de Dijon publikan paroladon, kiu varbis Méray, kaj tio estis la fonto de E-igo de multaj francaj eminentaj prof-oj. Kun Méray li propagandis buŝe kaj skribe kaj gvidis kursojn sukcesplenajn. Paroladis en pluraj urboj en Francujo kaj Belgujo. Publikigis kurscĵn en »Le Chasseur Français« kaj en gazeto en Canada. Redaktis la gazeton »E'« (v. Berthelot) Skribis en E-aj gazetoj (Revue k. a.) Verkis kun Berthelot: Komerc-aj Leteroj, 1903. Sola: Cours pratique d'E, 1905. Vojaĝo de Uliso, 1905. Bukedo (kolekto da artikoloj precipe pri lit. temoj), 1908.

Lambert Daniel Henry, anglo, sollicitoro. Nask. jan. 1852, mortis 11 nov. 1930. Lingvisto, dum la milito registara cenzuristo. La lasta restinto el la sep fondintoj de BEA. Trad. dramojn de Shakespeare: Makbeto, Julio Cezaro.

La Militrezistanto. Novaj-eldonajo de P Internacio de Militkontraŭuloj. Fondita en 1930. Aperas neregule. Formato 20,5×14. (v. Militrezista movado.)

La Mirinda Historio de Petro Schlemihl. De Chamisso, el la germana trad. Wüster. »Fantazia rakonto pri la homo perdinta sian ombron. Fide-la, preciza traduko.« (G. S., E' 1922, p: 214.)

La Mistero de P Sango. De Otto Forst de Battaglia, el la germana trad. T. Jung. 1934, 156 p. »La libro rezultas el multjara detala studado pri la scienco genealogia. Kvankam plene scienca, ĝi estas facile komprenebla.« (J. C. F., »The British E-ist«, sept. 1934.)

La Mizantropo. Komedio de Molière, el la franca trad. Boucon. 1930, 104 p. »Profunda satiro pri la socio; en ĝi la sincera, verdirema Alceste staras kontraŭ la mensogema, facilanima, eleganta mondo... La traduko estas ĝenerale tre bona kaj laŭ-

dinda . . . Sed la versformon mem mi opinias malfeliĉe elektita.« (y, **Lingvo Libro**, 1934, p:14.)

La Mondon al ni! De E. Kilian. 1934, 72 p. »Du junuloj forlasas siajn studojn por senmone kaj senpasporte vojaĝi per faldebla boato tra orienta Eŭropo . . . Trovante, ke per E ili pli facile renkontos helpemajn amikojn, ili decidas lerni la lingvon. La lingvo estas bona, la stilo interesa kaj vigla.« (»The British E-ist«, 1934, p: 346.)

La Mondo de Sinjoro Arne. Verkis Selma Lagerlöf, el la sveda trad. E. n. g h o l m, 1933, 110 p. »Rakonto el la deksesa jarcento. Ĉarma, riĉa stilo.« (E' 1933, p:155.)

La Morto de Blanjo. Romaneto de T o u s s e u l, el la franca trad. B e r g i e r s. 1925, 72 p. »Terura sinsekvo de malfeliĉoj . . . kun celo kontraŭbatali homan ekspluatadon kaj alkoholismon.« (G. S. E' 1926, p:56.)

La Morto de la Delegito de UEA. Komedio el la vivo de E-istoj de N. H o h l o v, 1924, 36 p.

La Morto de Smail-Aga Cengijliĉ. Heroa eposo de M a z u r a n i ĉ, el la kroata trad. Š p i c e r. 1933, 76 p. La poemo, ĉerpita el la krudaj tempoj de porekzistaj liberbataloj, impresas forte kaj freŝe.« (Kopar, Bibl. Gazeto, 1933, p:25.)

La Movado. Fondis kaj red. E. H o u b a r t en 1909, aperis ĝis jul. 1914, poste de okt. 1923 ĝis 1933. Formato 33×25. Estis »plej efika propagandilo ilustrita, bonstila, interesa, tute aktuala centra franca organo.« (BIL, p: 324.)

Laudenne Armand, belgo, kalkulisto en Huy. De 1908 seninterrompe UEA-del.

Landnomoj. Malfacile solvebla estas la demando pri la land- kaj popolnomoj ĉar estas tute neeble respekti la principon de int-eco nek la principon de simpleco kaj senescepteco.

Oni multe kritikis la duoblan kompromisan procedon, kiun Z, post kelkaj ŝanceliĝoj, definitive alprenis. Laŭ tiu ĉi procedo la gento donas sian nomon al sia lando per aldono de l' sufikso uj, kiam temas pri la Antikva mondo (Eŭropo, Azio kaj Egiptujo); sed, kiam temas pri la Nova mondo

(Afriko, esceptante Egiptujon, Ameriko, Aŭstralio kaj Oceanio), estas la lando, kiu donas sian nomon al la regnaro per aldono de l' sufikso a n. Tiu ĉi duforma procedo estas ankoraŭ pli malsimpligata per kelkaj esceptoj, kiujn postulas la int-eco: kvankam eŭropaj aŭ aziaj, la sensufiksaj nomoj »Nederlando, Holando, Finnlando, Irlando, Islando, Sirio, Asirio, Armenio, Anamo, Tonkino, Manĉurio, Siberio« montras ne la popolon, sed la regnon kaj oni devenigas de ili la popolnomon: »Nederlandano, Asiriano« ktp.

Aliflanke oni kontraŭas al int-eco devenigante Italujo el Italo, Portugalujo el Portugalo, Japanujo el Japano. Egiptujo el Egipto, ĉar en la koncernaj lingvoj (kaj ankaŭ en la latina por Egiptujo) oni uzas la inversan procedon.

Por simpligi kaj unuformigi la duoblan Z-an procedon, oni proponis sensufiksigi senescepte ĉiujn landnomojn, sufiksigante ĉiujn nomojn de gentoj aŭ nacioj kaj rezervante al tiu ĉi signifo la sufikson a n, dum oni montrus la loĝantojn, laŭ la konstanta ekzemplo de la naciaj lingvoj, ne per ia plursenca sufikso, sed per la preciza, oportuna kaj int-e uzata esprimo: »loĝanto en«. Tiu ĉi procedo certe estas simpla kaj konforma al la efektiva etnografia realeco, kiu montras al ni, ke senmiksaj rasoj kaj gentoj, jam ekde la antaŭhistoria tempo, ne plu ekzistas. Jam en la jaro 1909, S-ro Rektoro Boirac, prez. de la L. K., starigis kiel principon, ke tiu ĉi procedo estas la ĉefa kaj plej ĝenerala maniero, ĉiam preferinda. Z mem konsideris ĉi tiun sistemon kiel la plej bonan kaj estonte definitive venkontan. Ankaŭ aliaj kompetentuloj ripetite esprimis la opinion, ke tiu solvo estus la plej taŭga, se ĝi estus ĉiukaze aplikebla. Fine tre atentinde estas, ke, laŭ la interesa rimarko de S-ro Hans Jakob, »en ĉiuj niaj Kongresoj oni konstante aŭdas tielajn reciprokajn prezentiĝojn: »Mi estas svedano; li estas franco; ĉu vi estas svizano? Ne, mi estas italano.« Tiuj uzoj montras senvolan emon al analogia ĝeneraligo kaj unuformigo. Bedaŭrinde, ankaŭ tiu ĉi al-

loga procedo prezentas malbonaĵojn kaj precipe la elekto pri la baza landnoma radiko estas malfacila. Ĉu Germaniano, Turkiano, Hispaniano estas taŭgaj vortoj? ĉu, akceptante formojn kiel Danano, Polano, Hispanano, Grekano, Britano, oni ne estos devigata preni duan diferencon radikon por signifi la landon, ĉar ŝajnas malfacile asigni la landan signifon al la vortoj Dano, Polo, Hispano, Greko, Turko, Brito. Aliflanke, ŝajnas ke formoj kiel Svedo, Svedano — Norvego, Norvegano — Portugaldo, Portugalano — Japano, Japanano — Franco, Francano — Egipto, Egiptano — Hungaro, Hungarano, estas tute taŭgaj el ĉiuj vidpunktoj.

Alian solvon oni proponis, tute konforman al la germanlingva kutimo, kiu plej ofte diferencigas la landnomon je la popolnomo nur per malsama finiĝo: »Schweiz, Schweizer — Schweden, Schwede — Belgien, Belgier — Polen, Pole ktp.« E povus montri la landnomon per la substantiva finiĝo -o kaj la popolnomon per adjektiva finiĝo -a. Bedaŭrinde estas neeble trovi por ĉiu lando radikon, kiu egale taŭgas por popolnomo.

La procedo, kiu ŝajne plej sukcesis, kvankam en efektiveco ĝi tute ne estas pli plene taŭga ol la aliaj, estis provita de UEA kaj estas uzata precipe de la SAT-anoj. Ĝi konsistas en la senescepta formado de ĉiuj landnomoj per la nova sufikso ,i' laŭ la modelo Franco (radiko), Francio (landnomo), Francia (adjektivo), Franciano (popolnomo). Kontraŭ tiu ĉi procedo oni prave argumentis, ke estas eraro rigardi la sufikson ,i' kiel int-e ĝenerale uzatan landnomon sufikson. Ekz.: England (angle, germane, svede), Angleterre, Inghilterra, Inghilterra (fr., hisp., port.) Angolország, Switzerland, Schweiz (germ., svede), Suisse, Svizzera, Suiza, Suissa; Sweden, Schweden, Suede, Sverige; France (angle, france), Frankreich, Frankrike; Denmark, Dänemark, Danemark, Danimarca, Dinamarca, Danmark; Greece, Griechenland, Grèce, Grekland, Hellas; Norway, Norwegen, Norvege, Norge (svede, norv., dane), Noruega, Norsko; Poland, Polen (germ., dane, norv., svede), Pologne,

Polska, ktp. Formoj kiel Francio, Hollandio, Islandio, Finnlandio, Kanadio, Marokio, Svedio, Kubio, Flandrio, Tonkinio, Kongio kaj ceteraj tute ne estas pli int.-aj nek pli taŭgaj ol la samsencaj formoj kun la sufikso u j. Ĉu ankaŭ Germaniano, Turkiano, Franciano, Hispaniano ktp. estas, laŭ int. vidpunkto, akcepteblaj formoj? Plie, oni ne sufiĉe rimarkis, ke la sufikso ,i' en la lingvoj, kiuj uzas ĝin, estas tre diverssenca kaj konfuziga, ĉar ĝi montras ne nur iafoje kontinenton, aŭ regionon, aŭ provincon, sed ankaŭ ofte multajn aliajn aferojn: scienco, arto, propra nomo de virino, abstrakta kvalito, abstraktaĵo, rezulto de ago, aro aŭ kolektivaĵo, profesio aŭ metio, ejo, ktp.

Fine, laŭ fonetika vidpunkto, la sufikso ,i' prezentas gravan malbonaĵon. Certo estas, ke oni ne devas troigi la gravecon de la belsoneco, pri kiu cetero ĉiuj oretoj neniam plene konsentas. Tamen oni ne povas nei, ke la akcentataj i-sonoj vere tromultiĝas en nia lingvo kaj pro sia troofteco pinglopike vundas la oreton. Ne estas do mirige, se la L. K. rifuzis oficialigi la sufikson ,i' por landnomoj.

Konklude ni devas konstati, ke nenia solvo estas plene kontentiga nek absolute kaj nediskuteble preferinda super la aliaj. Sekve pli saĝe kaj sendanĝere estas pacienci kaj provizore kontentiĝi je la solvo liverita de Z, kiu ne estas pli kritikebla ol la aliaj proponitaj solvoj. Tio ebligas, ke ni konservos nian unuecon ĝis la tago, kiu certe pli malpli frue venos, kiam pli multaj regnoj, akceptinte tutmondan helpan duan lingvon, decidis por ĝenerala interkonsento neŭtraligi kaj unuformigi la geografian kaj etnografian terminaron.

V. io-ujo-batalo.

E. GROSJEAN-MAUPIN.

Landoj de l' Fantazio. Romano, originale de Teo Jung. 1927, 324 p. »La aŭtoro aviade nin gvidas al lando perdita inter nepeseblaj altmontaroj, kaj per fleksiĝema — iom novigema — lingvo li pentras siajn sorĉbildojn. Poste li kondukas du princojn en niajn centrojn de l' civilizacio, eĉ al Horrem en Eŭropo. (J. P. R., 1928. n-ro 6—7.)

La Nekonata Konato. Mistera rakonto, originale de D. P. B o a t m a n. 1933, 124 p. »Ventfrape rapida, glata, agrabla, rutina, facila stilo.« (Bibl. Gazeto, 1933, p. 63.)

Langlet (lanlé) Valdemar B., svedo, verkisto, redaktoro, de 1932 lektoro de sveda lingvo en la Budapeŝta Universitato. Nask. 17 dec. 1872 en Lerbo. Verkis librojn pri Rusujo, pri la mondmilito ktp. Multe vojaĝis en Eŭropo, Azio kaj Afriko. Unu el la pioniroj de E en Svedujo. Kunfondinto de EK en Uppsala, 1891, ĝia prez., 1892—99. Unuaj E-istaj vojaĝoj en Rusujo, ktp. Kunfondinto de Lingvo Int. en 1895. Prez. de SEF de ĝia fondo, 1906, ĝis ĝia fendo per la Ido-skismo paske 1909. L. edziĝis en 1899 kun Signe Blomberg el Abo, Finnlando, fervora E-istino, kun kiu li konatiĝis per E; post ŝia morto, 1921, li denove edziĝis en 1925 kun Nina Borovko el Moskva, filino de sia E-ista amiko N. A. Borovko.

La Nigra Galero. De W. R a a b e, el la germana trad. F. W i c k e, 84 p., dua eld. 1922, 64 p. »Historia romaneto el la geksesa jarcento. La stilo de la traduko estas korekta kaj impresa.« (G. S. 'E', 1922, p. 218.)

La Nova Epoko. Klasbatala revuo, tute en E. Fondita en 1922. Aperis ĝis aŭg. 1923, poste de okt. 1928 ĝis febr. 1933. De 1923 ĝis 1928 kaj de febr. 1933 anstataŭ ĝi servis aliaj SAT-organoj. (v. p. 182; v. Laborista movado.)

La Nova Tago. Int. Bahaa Gazeto. Fondita en 1925. Aperas neregule. Formato 22×15. Red. d-ro H. G r o s s m a n n. (v. Bahaismo.)

Lanti E. (ps. de Eŭgeno A d a m), normando, instruisto pri manlaboro kaj geometria desegnado. Nask. 19 jul. 1879 en Nehou de farmistaj gepatroj. Estis sinsekve terkulturisto, lignajisto, meblofaristo, meblodesegnisto. Studis ĉe vesperaj kursoj en diversaj lernejoj ĝis 1914. Kunlaboranto al fakrevuoj kaj al antaŭmilitaj anarkiistaj gazetoj. Lernis E-n en 1914—15 ĉe la fronto, kie li estis mobilizita en ambulanco. Post la malmobilizo, fariĝinte tre skeptika pri anarkiismo, sia politika kredo, ekdediĉis sin al la

mondlingva movado; en 1919 ankoraŭ hezitis ĉu aliĝi al E aŭ al Ido, fine decidis por E. Kiam tiutempe parizaj laboristaj E-istoj klopodis restarigi la movadon, oni proponis al li la taskon de redaktoro al la noveldonota »Le Travailleur E-iste.« El tiu ĉi gazeto naskiĝis »E-ista Laboristo«, ankaŭ red. de li. En ĝi li skizis la taskojn de la lab. E-istaro, pledis por ties memstara organiziĝo, (»ni fosu nian propran sulkon«), per sennacieca organizformo, por praktika utiligo de E por lab. celoj. Kun L. Banmer, L. Glodeau k. a. li restarigis la antaŭmilitan asocion: »Liberiga Stelo«, kiu en 1921 transformiĝis en »Sennacieca Asocio Tutmonda«. (SAT). Ĉi tiun organizon li gvidis ĝis 1933 kaj montris ĉe tio eksterordinaran kapablon. La malfacilan taskon kunlaborigi diverstendencanojn en unu organizon li plenumis kun granda takto. Lia laborpovo estas senkompara. Krom ampleksega korespondado, li redaktis aŭ gvidis la redaktadon de LTE; L' E-iste Révolutionnaire; L' »Antimationaliste«, »Sennacieca Revuo« Sennaciulo; La Nova Epoko. Krom franclingvaj broŝuroj pri E li verkis: For la Neŭtralismo (1922); La Laborista E-ismo (1928 40 p.), kiu aperis ankaŭ en angla, ĉeĥa, franca, germana, nederlanda kaj sveda lingvoj, (ĝi estas kvazaŭa programo de SAT movado); Naciismo, studo pri deveno, evoluado kaj sekvoj (1930, 124 p.); Vortoj de Kamarado Lanti, kun antaŭparolo de L. Banmer, kolekto de artikoloj (1931, 192 p.); Manifesto de sennaciistoj (1932, 32 p.), aperis ankaŭ france. Trad. Kandid de Voltaire kun antaŭparolo (1929, 162 p.) kaj Skizo pri filo zofio de l' homa digno de Gilles, 1934. Kunlaboranto de la Enciklopedio (v. Laborista Movado.) BRUIN.

La Okuloj de la Eterna Frato. Legendo de St. Z w e i g, el la germana trad. H. W o l f, 1932, 65 p. »Temo: la peza problemo pri la respondec de l' homa ago. La stilo estas intence simpla, kaj tio feliĉe helpis la tradukintinon. Ĉi tiun libron mi metus en la manon de l' junularo. (Totsche, Bibl. Gazeto, 1933, p. 27.)

La Ondo de E. Estis feliĉa cirkonstanco, kiam, post la malsukcesoj de „E”, »Ruslanda E-isto« kaj precipe »Espero« de Bitner, troviĝis persono — A. Saĥarov en Moskvo — kiu oferis monon kaj tempon por komenci en febr. 1909 la eldonon de LOdE. Dum la unua jaro aperis 10 kalendaroj (12 n-roj) entute 44 p. 54×35. En jan. 1910 la formato ŝanĝiĝis en 27×19 kaj restis tia ĝis la lasta n-ro en apr.-majo 1917; de tiu formato aperis entute 89 n-roj. (75 kalendaroj) kun 1320 p. Krom ampleksa ruslanda kroniko LOdE enhavis modelan literaturon kaj poezion kaj serion de 137 portretoj de konataj E-istoj. La abonantoj ricevis senpage la jenajn donacojn: 1912: Princo Serebrjaniĵ de A. Tolstoj; 1913: Orienta Almanako; 1914: E-a Poŝkalendaro por 1915. P. TARNOW.

La Ora Epoko. Gazeto religia, »bazita je fakto, espero kaj kuraĝigo.« Fondita en 1928. Aperas neregule. Formato 30×21. Red. A. E g g, Baden.

La Orienta Revuo. Monata organo de JEI; ĉefe japanlingva. Fondita en 1919. Red. K. O s s a k a.

La Padova Lilio. Mallonga biografio de S. Antonio. Originale de C a r o l f i. 1926, 119 p.

La Paŝoj de Jarkvino. Skizoj pri socialisma konstruado. Kunmetis N. P o t a p ĉ i k. 1932, 110 p. »Tre instrua libro por tiu, kiun interesas faktoj kaj ne blindigis ia partia fanatikeco.« (Butin, HĪE, 1932, n-ro 22.)

La Parizaneto. Resumeto de la vivo kaj manieroj de la francoj, kun specialaj rimarkoj rilate al Parizo de R. K r o n, el la franca trad. C o n n o r kaj H a y e s, 1904 (?), 126 p. »Uz-ebla kiel lernolibro.« (L. I. 1908, p: 91.)

La Patrino. Dramo de Rusinoli, el la kataluna trad. S a b a d e l l. 1909 (?), 148 p. »Historio de juna, malriĉa pentristo, kiu forlasas la patrinan domon por serĉi en la granda urbo la gloron kaj la feliĉon... Flua estas la stilo de la traduko kaj vere tute klasika.« (Th. C., L. I., 1910, p: 473.)

La Pentroarto en la Malnova Hungarujo. Verkis I. G e n t h o n, el la hungara trad. F r. S z i l á g y i. 1932, 72 p., kaj 96 bildopaĝoj. Eleganta eksterajo. »La E-a eldono estas speci-

ale grava, ĉar per ĝi estas eble konigi al ĉiuj popoloj de l' mondo ĉi tiujn antikvajn hungarajn trezorojn, eble tute ne diskonigeblajn sen E.« (El la Enkonduko.)

La Pirato. Spritzgazeto, fond. en 1933 »Kaperas ĉiumonate. Kalendaroj por Satiro, Humoro kaj Libereco... relativa. Ŝiestro: R. Schwartz.«

La Ponto. Organizaĵo, formiĝinta en Bern 1910, kiu celis la starigon de unu sola plano por ĉiuj kulturaj entreprenoj de la nuntempo. Inter aliaj tezoj de sia laboro, ĝi decidis praktike utiligi E-n kaj publikigis en E solidan verkon (1911), temantan pri la bazaj principoj de sia estonta agado. Ostwald oferis al LP 100.000 markojn kun kondiĉo, ke ĝi akceptu kaj uzu Idon. Ido do fariĝis la lingvo de LP. En 1913, post la ĉeso de la subvencio de O., LP-n trafis bankrotiĝo kaj ĝia agado ankaŭ ĉesis. (Laŭ Drezen, Hist. de Mondlingvo, p: 194.)

Lappi Lauri Ilmari, kuracisto. Nask. 15 okt. 1899 en Suonenjoki. E-isto de 1918. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio (por Finnlando).

La Praktiko. »La gazeto, kiu instruas kaj amuzas.« Fondita en 1930. Aperas monate, 12—16 p. Formato 31×24. Eld. la Int. Cseh-Instituto, red. A. Cseh. Konstantaj rubrikoj: Lerno per la eraroj!; Al la venko; La mondo ridas; La mondo estas interesa; Informoj; Konkursoj; Grafologio; Korespondu. Multaj fotoj pri la E-ista vivo. Interese redaktata.

La Progreso. Gazeto en Ĉeĥoslovakujo, fondita en 1918. De 1923 of. org. de ĈAE. Red. R. H r o m a d a. Formato 28×29. (v. p: 92, 93.)

La Rabistoj. Dramo de Schiller, el la germana trad. Z. 1908, 144 p. Junaĝa verko, plena je forto kaj ribelo kontraŭ la leĝoj, »pro kiuj el agloflugo fariĝas limakirado.« Legante tiun tradukon »ni denove kaj profunde sentas, ke la lingvo de Z ne estas ia senviva ligita aŭtomato, kies ĉiuj movoj estas fikse antaŭregulitaj de ia logikema mekanikisto.« (Bourlet.)

La Revuo. Monata gazeto en E. La E-movado ricevis bonan impulson, kiam prof. Karlo Bourlet komencis en 1900 propagandi E-n. Li instigis la konatan francan librejon Hachette kaj

Ko. (v.) eldoni sub kontrolo de Z multajn bonajn E-ajn librojn kaj komenci en sept. 1906 la eldonon de pure literatura revuo sub lia redaktado, kiu tute ne okupiĝis pri diskutoj, sed rigardis E-n kiel fakton. La gazeto aperis dum 8 plenaj jaroj de sept. 1906 ĝis aŭg. 1914. Aperis entute 6164 paĝoj. Ĉiu jarkolekto havis 12 kajerojn kun po 48 paĝoj da literaturo kaj 16 p. da informoj de societoj, diversaj sciigoj kaj anoncoj. Sur la unuaj 4—22 paĝoj L. R. havis nur verkojn, tradukojn, kongresparoladojn ktp. de Z kaj sur la ceteraj verkojn de la plej bonaj E-tradukistoj kaj verkistoj. Z fine, post morto de La E-isto en 1895 havis denove gazeton, en kiu li povis publikigi siajn modelajn tradukojn el la Biblio kaj de diversaj verkistoj (Gogol, Schiller, Andersen, Goethe, Orzeszko, Molière) Inter la kunlaborantoj estis la plej bonaj verkistoj: Kabe, Grabowski, Hodler, Lambert, Bicknell, Vallienne, Kabanov, Boirac, Privat, ŝidlovskaja, Hankel, De Ménil, Inglada, Aymonier, Noel, Rust, Ĉejka, Pillath, Simon, Dalmau, ktp. La redakcio de L. R. havis grandajn meritojn instigante la E verkistojn ankaŭ per ĉiujara Literatura Konkurso. P. TARNOW.

Larroche (laroŝ) Marie, francino. Nask. 18 marto 1854 en Metz. Okupis sin precipe pri blinduloj, por ke ili povu akiri siajn vivrimedojn ne per almozoj, sed per laboro. E-iĝis en 1909, sub entuziasma gvidado de Colas. Helpis lin propagandi, precipe ĉe katolikoj, partoprenis en starigo de kvin kongresoj de IKUE. Dum kelkaj jaroj adm. de Espero. Katolika. Vicprez. de IKUE, kies »Avino« ŝi estas nomata.

Larson Gustav Adolf, svedo, ĉefkontisto. Nask. 1 dec. 1838 en Falun. E-isto de 1905. Kas. de SEF. Kunfondinto kaj kas. de Eldona Societo E-a de 1908. Ĉefdel. de UEA.

La Reformanto. Popola biografio de S. Francisko el Assisi. Originale de Carolfi 1927, 88 p.

La Regado de si mem per konscia aŭtosugestio. De Coué, el la franca trad. J. Borel. 1925, 56 p. Laŭ tiu teorio »ne volo, sed imago efektive estras niajn agojn.«

La Reĝo de la Montoj. De E. About, el la franca trad. G. Moch. 1909, 248 p., kun 158 ilustraĵoj. »La ĉefa merito, se ne la sola, de la verko estas ĝia mirinde klara, rapida, flua, gaja kaj ĉiam klasika stilo. Vane oni serĉus unu el tiuj lit. ecoj en la »anguloza« traduko de s-ro Moch.« (Th. C., L. I. 1909, p:189.) »Tre viva kaj lerta stilo. Bonega kaj pura E-a lingvo.« (C. B., La Revuo, 1909, p:574.)

La Reĝo Judea. Dramo en 4 aktoj de K. R. (Romanov), el la rusa trad. Devjatnin. 1914—15, 182 p.; dua eld. 1923. »La temo: turmentado de Kristo, lia morto kaj reviviĝo, respektas la evangelian tekston. La versoj de P traduko estas ĉiam regulaj kaj tuj kompreneblaj.« (G. S., E' 1923, p:223.)

La Rejna Ste'lo. Jam antaŭ la mondmilito estis eldonita en Elzaso en la urbo Mülhausen bela E-a gazeto »Elzasa Sonorilo«. Post la milito Strasburgo fariĝis la centro de tre vigla E-a movado, precipe subtenata de Hubert Ferez, kiu en aŭg. 1921 komencis eldoni LRS, 4 p. 47×31 en E-a, franca kaj germana lingvoj. Tiu bone redaktata gazeto jam malaperis post la 2-a n-ro. Sed Ferez ne pacienciĝis: en 1924—25 li eldonis »La Stelo«-n (entute 7 n-roj, 4—6 p. 31—33×23—25 presita) kaj en junio 1926 li reeldonis LRS bone aŭtografita kun multaj bildoj 4—6 p. 38—40×28—29. Jan-sept. 1929. LRS estis presita 4 p. 43—45×31—32 kaj de jan. 1930 ĝi fariĝis parto de »La Tribune E-iste« (v.). P. TARNOW.

La Revizoro. Komedio de Gogol el la rusa trad. Z. 1907, Satiro pri la korupteco de la rusa burokrataro.

La Samanta-Mukla-Parvarto aŭ Evangelio de Avalo-kiteŝvaro. Trad. el la sanskrita kaj komparis kun la ĉina traduko K. Nohara. 1933, 36 p. Parto el sankta budaisma verko: ĉapitro pri la virtoj kaj agoj de A. K. Traduko peza.

La Sankta Biblio. v. Biblio.

La Sendanĝereco de Francujo, Tekstoj kaj dokumentoj. Verkis A. Honnorat; diversaj tradukantoj. 1924, 154 p. Titoloj de la du partoj: La kontrasto de 1919 kaj ĝia fiasko; Evoluado de la problemoj de 1920.

La Socialisto. Gazeto en E kaj germana lingvo. Fondita en 1926. Organo de ALLE, en 1933 ankaŭ tiu de ISE. Formato 24×16, de 1931 32×24. Bone redaktita. Pereis kune kun la detruo de la demokratio en Aŭstrio, febr. 1934. Reviviĝis en Francujo.

La Songo de Makaro. Kristnaska rakonto de Korolenko, el la rusa trad. M. Ŝidlovskaja. 1927, 48 p. »Ĝi unue priskribas la malgasteman nordan Siberion kaj due vive pentras popolanon. Bona traduko.« (G. S. E, 1927, p: 64.)

La Sorĉistino el Kastilio. Historia bildo de Salom Asch, el la juda trad. Lejzerowicz, 1933, 148 p. »Torturigas kaj mortas judoj en la tempo de P' papa inkvizicio — la tendenco de P' libro do estas ekzalti la judajn animojn al persisto kaj ortodokseco. La lingvaĵo de P' traduko estas bona, tre flua.« (N. B., S. R. 1933, p:100.)

La Straŭga Butiko. Poemoj originale verkitaĵ de R. Schwartz. 1931, 124 p. »Ĝi montras la poeton jam egalranga al la prozisto. La viv-filozofio de P' poeto mantestiĝas kun plena matureco. Cion li esprimas per delikata, facila, serena stilo, li scias trakti seriozajn kaj profundajn temojn en la plej klara, plej simpla formo.« (Totsche, De Paĝo, p:102.)

La Suda Kruco. Estis organo de Aŭstralaziaj E-istoj. La 1-a n-ro aperis jul. 1920, la lasta (165-a) 12 okt. 1934. Formato 22×14. En la lastaj jaroj ĝi estis aparte bone redaktata kaj ĝia redaktisto R. Banham faris en ĝi recenzojn kaj lingvajn notojn neordinare valorajn kaj atentindajn. M. C. BUTLER.

La Suda Stelo. Organo de la E-movado en Jugoslavujo. Fondita en 1932. Aperas monate Formato 28×20. Red. Fr. Homar, poste d-ro Kun. (v. p:268.)

La Suno Hispana. La plej ofte revigla kaj serioza E-a vivo en Hispanujo estis multe malhelpata kaj ofte sufokata de la naciaj kaj personaj kontraŭbataloj. Ĝis 1910, kiam la movado ne estis ankoraŭ ampleksa, regis entute unueco, kaj LSH, of. org. de la HSPE, kiu komencis aperi en okt. 1903, povis bone vivi kaj tute

regule aperi ĉiumonate. Sed de 1910, la jaro, en kiu, estis fondata la KEF kaj komencis aperi »Kataluna E-isto,« ĝi eliris tre malregule kaj ĉesis en jan. 1913. Ĝi estis en majo 1913 anstataŭata per »El E-ista«. Kvankam »Kataluna E-isto« daŭris aperi en la kataluna parto de H., la hispana parto restis sen gazeto, ĝis kiam Mangada Rosenörn en Madrid komencis eldoni en jan. 1917 »Hispana E-isto«-n. LSH estante pure prop. gazeto, HE estis tute skribita en E kaj favoris krom la propagando, la poezion kaj literaturon kaj donis en ĉiu n-ro bonajn priskribojn pri hispanaj pejzaĝoj, urboj kaj konstruaĵoj kun multaj belaj bildoj. Ĝi aperis tute regule monate ĝis febr. 1923, kiam Mangada devis transloĝiĝi al Afriko. Dum ĉi tiu tempo kelkaj malnovaj E-istoj restarigis LSH kaj fondis HEA-n, kies of. org. estis LSH. Mangada, kiu revenis el Afriko, cedis la intencon, reldoni HE-n, por ne malhelpi la movadon. Tiu epoko daŭris 3 jarojn, de jan. 1924 — dec. 1927. Nun la vojo por Rosenörn estis denove libera kaj li eldonis de jan. 1928 — ? »Hispana E-isto« kaj de ? — hodiaŭ »Hispana E Gazeto«-n kiel of. org. de HEA. P. TARNOW.

La Tajdo. Poemioj lirikaj, originale de Hohlov. 1924, 64 p. Unusola poemaro de talenta poeto. Plejmulto de la poemoj kantas pri amo, en aliaj esprimiĝas revoluciaj impulsoj.

La Teatra Korbo. De J. Baghy. 1934, 112 p. »En tiu ĉi pensiga volumeto oni trovas diverstemajn meditaĵojn kaj skizetojn simple kaj bonstile esprimitajn en la formo de »senpretenda babilado«. Por tiu, kiu konas la aŭtoron persone, ili ricevas aldonan ĉarmon el la fakto, ke grandaparte ili havas aŭtobiografiajn karakteron.« (»The British E-ist«, 1934, p: 348.)

La Tragedio de l' Homo, drama poemio, ĉefverko de la hungara literaturo, verkita de E Madách en 1861, trad. de Kalocsay. 1924. XXIV kaj 237 p. 21 bildoj. Adamo, la ĉefa persono de la verko, travivas la tutan historion de la homaro. »La verko havas sian ĉefan valoron ne en sia arta forto, sed en la forto de la penso, en la grandiozeco de la koncepto, en

la abundo de l' ideoj.« (El la Enkonduko.)

La Tragedio de Reĝo Lear. De Shakespeare, el la angla trad. A. L. Curry kaj A. J. Ashley. 1924, 172 p. »Certe laŭ precizeco kaj ĝustigo al la originalo superas la anglaj tradukintoj, sed kion ili gajnas je fideleco, tion ili perdas je facileco kaj komprenebleco. (G. S. 'E', 1924, p: 125.)

La Trezoro de l' Oraĵisto. De A. Senoa, el la kroata trad. Kolar Krom, 1911, 290 p. »Belega bildo de la mezepoka kruela kaj persista interbatalado de l' Zagreba burĝaro kaj aristokrataro. La stilo tute ne estas malbona. La traduko enhavas strangaĵojn, kredeble naciismojn.« (M. Sidl., Ondo de E, 1912, p: 72.) »Maro da eraroj.« (P. J. Cameron, »The British E-ist«, apr. 1912.) Simile al P. J. C. recenzis ankaŭ aliaj.

La Tribune Espérantiste. Grava prop. gazeto en franca lingvo. Fondita en 1930 de H. Ferez, kiu ankaŭ redaktas ĝin. Aperas kvaronjare en 60×45 formato.

Latvolando. Antaŭ la mondmilito tiu ĉi teritorio apartenis al cara Ruslando. La registaro ĝenerale ne volonte donis permeson por fondo de societoj, ankaŭ multaj personaj rajtoj estis limigitaj. En la urboj tre multaj parolas 3 lingvojn: latva, germana, rusa. Krome oni studas en lernejoj anglan kaj francan lingvojn. La loĝantaro ne multe sentas bezonon de komuna interkomprenigilo. Jen la kaŭzoj, kial E ne havas tre fekundan grundon en la lando.

Unua pioniro estis instruisto R. Lieks, kiu en 1889 verkis la unuan lernolibron por latvoj. Post lia formigro al Brazilo dum 90-aj jaroj, pri E oni aŭdas nenion. En 1904 en Riga fondiĝis filio de Peterburga ES »Espero«. Tiutempe multe helpis la movadon M. Klaczko, donante ejon kaj monrimedojn. Vl. von Szurlo fondis en 1910 ES »Riga Stelo« kaj eld. monatan revuon Riga Stelo 1910—1911

Riga ES estas fondita 29 marto 1912 de K. Busch, J. Alksnis, P. Rodd. Ĝia regularo estis peza, kreinte konsilantaron 12 personan kaj estraron 6 anan. La agado ne estis sukcesa. E-n

posedis nemultaj. Ĉar ĉefe oni uzis rusan lingvon, multaj baldaŭ ekŝiĝis, tial post l' jaro el 36 anoj restis kelkaj. Oni denove eklaboris en 1913 atingante jarfine 47 anojn, en la biblioteko estis 31 libroj. Kursoj ne okazis. Malsukcese aranĝita vesperbalo tute disigis la anaron. Tiutempe ĉefe agis: J. Alksnis, A. Abel, A. Krasting. La lasta kun siaj fratinoj ankaŭ zorgis pri konservado de societa havaĵo dum mondmilito kaj registrado ĉe la estrantoj — germanoj kaj bolŝevikoj.

De 1920 la movadon aktive partoprenis: A. Krauze, T. Indra, K. Kacens, E. Grots, A. Krastinš, K. Leiskalns, A. Kajoks, A. Libers, G. Tupicin, f-ino R. Dvarionoviĉ, kaj (precipe kursgvidante) Kr. Strazds, E. Jaunvalks, N. Blumbergs, f-ino E. Balode, s-ino M. Pirkst, I. Čaĉe, Fr. Krogers (la lasta havis en l' kurso 100 kursanojn).

Pro enketo de Ligo de Nacioj, Latva Kleriga Ministerio en 1922 favore raportis pri E kaj en 1923 la ministro disponigis al Riga ES senpagan ejon en Kastelo, ĉambroj de historia arĥivo, kie la societo kunvenadis ĝis 1930. Interna Ministerio subvencis en 1923 E-kurson por fervojaj policanoj. Samjare estis registrita nova statuto, donanta pli da aglibero. E. Grots multe propagandis per gazetoj. La taggazeto »Latvijas Sargs« presis E-an kurson.

La societo partoprenis en 1923 kaj 1924 en Riga Foiro-Ekspozicio, por kio klopodis E. Grots kaj T. Indra. La foiro en 1924 eĉ presis E-an reklamilon. Riga ES partoprenis en 1926 ankaŭ 2 radioekspoziciojn, organizis T. Indra, kaj en 1932 en Latva Produktaĵekspozicio, organizis J. Kalniņš (la standon oni premiis per rekonatesto).

En 1923 komenciĝis ankaŭ interna vivo, kursoj, vesperbaloj, 20 jan. 1923 unuafoje oni prezentiĝis E-an teatraĵon »Konvenajoj«. Aktoris: K. kaj T. Indra, f-inoj M. Dzelzite, L. Berzin, s-ro I. Čaĉe. Samjare oni pre. entis ankoraŭ unu teatraĵon, en 1929 »Konvenajoj« estas ripetitaj, en 1933 printempe estas luditaj 2 teatraĵoj

En 1924 Riga ES sendis al ĉiuj lernejoj 2000 latvalingvajn propagand-

ilojn de Kr. Strazds. En 1925 la socio ekeldonis sian organon *Ond de Daŭgava*, monata revuo. En somero 1926 A. Krastinš unuafoje prelegis radie pri E, 15 dec. 1929 pri Z legis T. Indra, 4 febr. 1932 H. Steiner (el Vien) pri Aŭstrio. En 1927 Riga ES organizis la unuan Latvan E-Kongreson.

Jam en 1924 estis ellaborita projekto pri Latva E-Asocio. Ĉar la fondiĝantaj provincaj ES-j malemis partopreni la Asocion, Riga ES 1928 ŝanĝis sian statuton tiel, ke ĝi sub nova nomo »Latva ES« rajtas akcepti kiel anojn ankaŭ ES-jn. 1929 registara oficiala eldono »Valdibas Vestnesis« (Registara Kuriero) presis deklaron pri neŭtraleco de E.

Aŭtune 1929 A. Cseh gvidis grandskalan kurson por 130 partoprenantoj, inter ili 28 instruistoj. En 1930 la socio kunvokis somere 1-an Baltlandan E-kongreson. En 1931 Latva ES invitis por 3 monatoj la faman hindan propagandiston L. Sinha. Li faris 40 prelegojn por 7450 aŭskultantoj en Riga kaj provinco, prelegante 18 foje por lernantoj kaj 22 foje publike. 1932 Latva ES invitis dufoje J. Baghy por kursgvidado. J. Kalninš malfermis E librejon. En lernejoj private ĝis nun instruadis A. Aizpuritis en Aluksne, G. Tupicin en Riga. Poŝta kaj telegrafa departemento korespondas en E kun ILEPTO.

Organizo. Latva ES (mallonge LatES) oficiale reprezentas neŭtralan E-movadon en Latvolando. En 1928 ĝin reorganizis el Riga ES: A. Kajoks, A. Krauze, T. Indra, E. Grots, A. Lihers, N. Blumbergs. Anoj en 1932: 106+25 (en filio de Aloja). Budĝeto en 1932: 778 orfrankoj, el kio kotizoj 265, vesperbaloj 136; ĉefaj elspezoj: ejo 230, balvesperoj, kursoj. Fakoj: drama (J. Kalninš), propaganda (T. Indra). Kursoj ĝis 1929 havis nur kelkajn dekojn da vizitantoj, en 1929 A. Cseh gvidis kurson por 130 personoj, en 1932 J. Baghy 3 kursojn por 220 kaj 2 daŭrigajn kursojn por 100. Biblioteko en 1932 enhavis 263 volumojn je 641 orfrankoj. El ili instruaj 46, historiaj 7, beletristikaj 112, sciencaj 20, diversaj 28, gazetkol-ektoj 50. Dum 1932 35 anoj legis

129 librojn. Filio en Aloja havas 75 librojn. LatES estraro en 1933: A. Krauze prez., s-ino E. Ziedinš vicprez., V. Krievs kas., f-ino R. Dvarionovič sekr., H. Hazenfuss vicekr., f-ino J. Krievs bibl., E. Sedlenieks trezoristo. Krome por informoj kaj propagando kunagas f-ino L. Jevsejeva. Societa organo *Ond de Daŭgava* ĝis 1932 mimeografata, de 1933 presata. Red. A. Kajoks, de 1932 G. Tupicin.

ES de Liepaja, fondita en 1925 de E. Jaunvalks vikle laboris ĝis 1929, lastatempe ree reviviĝis. ES »Estonto« fondita en 1929 de R. Stammers en Liepaja. Li aranĝis multajn kursojn, propagandis per gazetartikoloj kaj klopodis ĝis oni alinomis en Liepaja straton »E-strato«. ES de Zemgale, Jelgava kiun fondis en 1924 Kr. Strazds, aranĝis en 1932 2 foje kurson de J. Baghy, ES de Ventspils, fondita en 1926 de A. Poniņš, kiu ankaŭ gvidas kursojn de E. Tuta nombro de E-istoj en 1932. en Latvolando: 1200 en Riga, 800 en provinco, sume 2000 inter ili organizitaj 300. Latvia Laborista ES. en Riga fondiĝis en 1927, estas fermita en 1929 pro aparteno al SAT. Baldaŭ fondiĝis Riga Laborista ES., kiu eldonas monatan revuon »Proleta E-isto«. Ĉefa aganto A. Krastinš, kiu ankaŭ gvidas kursojn. ĉe Popola Altlernejo.

Kongresoj: 1-a Latva E-Kongreso estis 30—31 okt. 1927 en Riga (Kastelo). Prez. A. Fridenbergs, partoprenis 62 personoj 14 gastoj kaj 3 delegitoj el Estonujo kaj 5 el Litovujo, Decidoj: ĉiu e-isto aliĝu al UEA kaj al tiuj ES-j, kiuj estas reprezentitaj en KR. Unua Baltlanda Esp. kongreso estis 22—24 junio 1930 en Riga (Kastelo). Prez. T. Indra, partoprenis 41 personoj, inter ili 6 estonoj, 8 svedoj. La kongreso rekomendis E-n al turismaj organizaĵoj kaj deziresprimis, ke e-istoj skribu proprajn nomojn nur per E-aj literoj.

Literaturo: Unua aparteldona vortaro latva-E estas Ulmanis kaj Straube, Jelgava 1925, iom malsukcesa. Ĝin sekvis pli ampleksa latva-E vortaro de T. Indra, Riga 1932 »Ileva«. En 1928 aperis latva ĉefeĉ-

ŝlosilo, trad. T. Indra. En 1933 J. Kalniņš aperigis la unuan pli ampleksan E-latvan vortaron. El *ler nolibro* la unua estas R. Libeks, Riga 1889, ĝin sekvis en 1912 lernolibro de P. Kikauka kaj J. Elert. De ĝi presiĝis nur 16 paĝoj, ĉar eldona firmo bankrotis. Longan tempon oni uzis rusajn kaj germanajn lernilojn. En 1924 Strazds kaj Bormanis aperigis pli modernan lernolibron kun aldonita E-latva vortareto. Ĝin baldaŭ sekvis Strazds, Kurso de E en 20 lekcionoj (nun jam 2. eld.) kaj luksa lernolibro de I. Caĉe. La unua latvalingva propagandilo estas tiu laŭ A. Fried, eld. Riga 1904, ĝin sekvis en 1907 germanlingva libreto. En 1923 Kr. Strazds verkis pli efikan varbilon »Lingvo Int. E«, kie estas ĉefe skizataj sukcesoj de E laŭ enketo de Ligo de Nacioj. Krome presiĝis kelkaj varbfolietoj, poŝtkartoj. El la beletristiko la unua estas novelo de J. Poruks »Vakciniuĵa krono«, trad. P. Kikaŭ, Paris 1909. Li ankaŭ duontrad. grandan romanon de A. Nidra »En fumo de hakiteĵo«, sed dum mondmilito la manuskripto pereis. En 1933 aperis tragedio el latva lingvo J. Rainis »Amo estas pli forta ol morto«, trad. I. Caĉe, lukse eldonita kun ilustraĵoj. Ĝin antaŭmendis multaj latvaj eminentuloj, ankaŭ la respublika prezidanto Kviesis. En 1927 E. Jaŭnvalks trad. latvajn popolajn kantojn, eldonitajn aparte. Kelkaj tradukaĵoj el latva lingvo (trad. E. Jaŭnvalks, R. Eĵhenbaŭms, A. Kajoks, f-ino E. Balode) aperis en LM kaj ankaŭ en »Ondo de Daŭgava«. La unua gazeto E-ista estis »Riga Stelo«, Riga 1910—1911 (ruse kaj E-e); en Liepaja en 1914 presiĝis ĉefe por bezonoj de la biblioteko de G. Davidov 200 e-roj de »Latva Stelo« nur n-ro 1 (en latva lingvo). De 1925 en Riga aperas »Ondo de Daŭgava«, organo de Latva ES (nur en E.) T. INDRA.

La Urbestro de Zalamea. Dramoj en versoj de Calderon, el la hispana trad. E. Legrand. 1925, 136 p. »Fortefikaj scenoj, trafaj diroj, spritaj ekpensoj, poeziaj kaj tre dramaj paroloj.« (L. M. 1925, p:132.)

Laurenti Gioacchino, italo, prof. mezlerneja de beletristiko, poste ofic-

eĉefo ĉe la senato. Nask. 21 nov. 1882. Kunlaboras en filologiaj revuoj. E-isto de 1905. Kunfondis en 1905 la ES en Roma »Imperiosa Civitas«, kies vicsekr. estis ĝis 1908. Kunlaboris al Roma E-isto.

Laŭroj. Kolekto de originalaj verkoj (de Artigues, Inglada, Hodler, Van Melckebeke, Ellis, Boucon, s-ino Vallienne, Gambier, Deligny, Bulhuis, Trinité) premiitaj de La Revuo. 1908, 139 p.

La Vagabondo: nomata de jan.—marto 1908: »La Vagabonda Monataĵo«, de apr.—julio 1908: »La Vagabondisto« kaj de sept. 1908: LV. Ĝis fino 1913 ĝi estis aŭtografiita kaj dum 1914 presita. Ĝi ĉesis pro la mondmilito. Red-ino C. Oxenford en Howe. LV estis la oficiala organo de la »E-ista Vagabonda Klubo«, kiu estis int. ligo de artistoj pri muziko, arto kaj literaturo. LV enhavis multajn artajn desegnaĵojn, originalajn literaturajn kaj eĉ muzikaĵojn. IV+16—48 p. 23×18. P. TARNOW.

La Vagabondo Kantas. Simplaj versoj. Originale verkitaj de Baghy. 1933, 60 p. »B. estas denaska lirikisto; en liaj poemoj manifestiĝas lia varma koro, senartifika, spontanea, melankolia, pasia poezio en formo perfekta. La volumo enhavas 74 poemojn.« (J. Major, Oomoto Int., 1933, jun.)

L' Avarulo. Komedio de Molière, el la franca trad. Meyer. 1904, 80 p., dua eld. 1907. Fama verko de la mondliteraturo. La traduko ricevis la unuan premion ĉe la dua konkurso literaturo de la SFPE. »Fidela reprodukto de la fizionomio de la teksto.« (L' E-iste, 1904, p: 181.)

Lavén Bernhard, svedo, remburisto en Örebro. Nask. 31 dec. 1865 en Ljungby. Pacifisto kaj teozofiano. E-igis kiel 64-jara maljunulo. Prez. de la EK en Örebro.

La Vendetta. Novelo de Balzac, el la franca trad. M. Merckens. 1911, 120 p. »Modelo de bela literaturo, dank' al tre laŭdinda traduko.« (L. I. 1911, p: 394.)

La Vendreda Klubo. 11 diversaj originalaj artikoloj, de la »Vendredoklubanoj« en Leipzig. 1921, 116 p. Enhavo: E kaj Frey-Ligo, Unuaj jaroj

de E en Leipzig, Saksa E-Biblioteko, Pri la Lingvaj Respondoj de Z, Pri la E-movado en Britujo, ktp. Modela stilo.

La Venecia Komercesto. Dramo de Shakespeare, el la angla trad. Wackrill. 1914, 102 p.

La Ventego. Dramo de Shakespeare, el la angla trad. Motteau. 1904, 93 p.

La Vera Historio de Ah Q. De Lusin, el la fina trad. Chun. 1930, 140 p. »Temas pri vivo de iu mizera vagulo, stultulo, kiu iras de unu malfeliĉo al alia. La verko liveras unu eklumon sur mistera mondo. La stilo ne estas sen meritoj.« (G. S. 'E' 1930, p: 136.)

La Verda Standardo. Dum la fruaj tempoj de E plej multe propagandis en Hungarujo A. Marich en Budapeŝt. Jam en majo 1905 li eldonis 'E'-n, kiu aperis ĝis marto 1907—IV+16 p. 23×15 entute 18 n-roj. kun 142 p. da teksto. En okt. 1907* ĝi alprenis la titolon LVS kaj fariĝis samtempe oficiala organo de HES, kiu ĝi restis ĝis nov. 1908. De tiam ĝi havis la subtitolojn: »Int. propaganda, literatura, arta, scienca, filatelia, industria, komerca, amuza, polica, reklama, ilustrita monata revuo. En ĉiuj eŭropaj lingvoj.« Do, ŝufiĉe multflanka! La presformato restis la sama kiel tiu de 'E' sed la paperformato kaj la kovriloj multe ŝanĝiĝis; paĝnombro de okt. 1907—okt.-nov. 1910 (n-roj. 49-50): 482. De jan.—julio 1911 LVS akceptis la formaton de ĉiutaga gazeto 42×29, entute 8 n-roj, kun 28 p. De sept. 1911—julio 1914 aperis entute 45 n-roj kun 552 p. 32×23—24 De sept. 1911 LVS fariĝis denove oficiala organo de HES. Sed ĉar la kunlaboro inter la societo kaj la red. kaj posedanto A. Marich neniam bone funkciis, la societo akiris la gazeton; red. fariĝis ĝis dec. 1913 Paul Robicsek kaj ĝis julio 1914 d-ro. Béla Rác. Pro la milito LVS reaperis en tre modesta formo en jan.—febr. 1915 kaj finiĝis finfine per la n-ro, de nov.—dec. 1915, 8—16 p. entute 12 n-roj kun 76 p. 24×16. P. TARNOW.

La Vila Mano. (Idoj de Cereso.) Romano, originale de Bulthuis. 1928, 316 p. »La romanoj de B. iel

similas unu la alian; la loko, kie okazas la rakontataj faktoj, estas la norda parto de Nederlando, kiun la aŭtoro intime konas; ties teraspekton kaj homkutimojn li ame priskribas. Kiom amuzaj la scenoj en la trinkejo, kiom nature pentrita la superstiĉo de l' kamparanoj.« (G. S. 'E' 1929, p: 49.)

La Vojaĝoj kaj mirigaj aventuroj de Barono Munchhausen. El la angla trad. Applebaum. 1927, 88 p. »Lernantoj trovas en ĝi legajon tiel agrablan, ke ili ne haltos antaŭ fino. La E-igita teksto estas tre bona.« (G. S. 'E', 1927, p: 186.)

La Vojo. Poemo de Z, verkita en 1896; presita en jun.—jul. n-ro de L. I. En ĝi Z aludis je ĵus venkitaj malfacilaĵoj »voĉdono en 1894« (v.) kaj ĉeso de La E-isto). »Vortoj, kiuj havos sian valoron tiom longtempe, kiom oni ankoraŭ devos batali pro agnosko por E.« (Artikolo de Behrendt en »Kongresa Jubilea Libro«, 1933.)

La Vojo de formiĝo kaj disvastiĝo de la lingvo internacia. De E. Drexler, el la rusa trad. N. N. SAT, 1929, 64 p. »Fortaj argumentoj por la diskutito kun kontraŭuloj kaj skeptikuloj.« (Jofo, La Socialisto, 1930, p: 8.)

La Vojo Returne. Romano de E. M. Remarque, trad. el la germana J. Berger 1931, 369 p. »La ekssoldato ne povas retrovi sian vivecon; unu suferas pro malfideleco de sia edzino, alia freneziga, alia memmortigas... La aŭtoro tiun nigran pesimistan revuon vidigas per sinsekvaj ĉapitroj, kiuj plurfoje rondiras. R. skribas preskaŭ pli vere ol la vero mem. La stilo de la traduko estas tre bona.« (G. S. 'E', 1932, p: 39.)

Lawrence (lorens) Eliza Ann., anglino, sekretario. Nask. 24 aŭg. 1851 en Wimbledon, Surrey. E-istiĝis en 1901, pro renkonto kun germana prof. en Germanujo, kiu promesigis ŝin lerni po 30 minutoj ĉiutage dum du semajnoj. De tiam ĝis nun fervora kaj senlaca laboranto por la movado. »La patrino de la brita E-istaro.« Sekr. de Londona Klubo, 1903. Hon. vicprez. de BEA. Mortis 4 apr. 1934.

Lawrence (lorens) William Francis, anglo, helpadministranto de fervojaj

varstacioj en Newcastle-upon-Tyne; prizorgas funkciadon de trafikrimedoj. Nask. 6 majo 1883 en London. E-istiĝis en 1912. Multaj prop. artikoloj kaj paroladoj. Sekr. de B. E-Kongreso, 1916, sekr. de York ES., 1916—31. Prez. de EF de Yorkshire, 1927—29.

Lazica (ŭazica) Stanislavo, polo. Agema E-isto en Lwów. Fondinto de la unua ES en P-ujo en 1906. Unua red. de P. E-isto, 1906—08, unua lektoro de E en la Lwowa reala altlernejo. Verkis lernolibron.

Leakey (liki) James, anglo, komercisto. Nask. 21 nov. 1849 en London. E-isto de 1909. Verkis *Leakey's Introduction to E*. Multe propagandas. Mortis 1 nov. 1934.

Le Cornec (lōkornek) Ludovic-Alexandre, (ps. Else), franco, privata oficisto. Nask. 15 dec. 1873 en Saint-Brieuc. Vicprez. de la Pariza grupo, gvidis kursojn dum 15 jaroj; estis agema membro de la »Verda Kato«. Tradukis de Barbusse: *Eklumo en la abismo*, 1923.

Lederer Siegfried, germano, gimn. prof. de la latina kaj greka lingvoj. Nask. 30 jun. 1861, mortis 8 nov. 1911 en Praha. Estis la unua, kiu faris lumbildparoladojn en Wien kaj poste ankaŭ en Praha. Aktiva Volapükisto, li transiris al E kaj estis kunfondinto de ES Verda Stelo en Praha en 1908. De 1908 li instruis E-n, ankaŭ en komerca lernejo en P., faris paroladojn pri E en Dresden, Berlin ktp. Estis red. de *Universo* kaj *Rund um die Welt*-ĉirkaŭ la Mondo. Verkis: *Vojaĝrememoroj el Grekujo* (en Ĉ. la M.), trad.: *Bildolibro sen Bildoj de Andersen*; *Judito de Hebbel*; *Sufero de Carmen Sylva*. A. BISCHITZKY

Ledermann Richard, germano, d-ro fil., prof., verkisto de historiaj kaj dramaj verkoj. Nask. 25 jul. 1875. E-isto de 1910. Gvidanto de la E-movado en Bavarujo, 1912—20. Prez. de LKK por UK en Nürnberg. Red. de »E ein Kulturfaktor«, 1912. Kunlaboris al 'E'.

Ledger (leĝer) George, anglo, stenografia instr. Nask. en Yorkshire, Mortis 54-jara 18 majo 1916. E-istiĝis 1903. LK. Adaptis Pitmanan Stenografion al E.

Lee (li) George Winthrop, usonano, bibliotekisto. Nask. 27 feb. 1867 en Roxbury (Mass.). E-isto de 1905. Prez. de EG de Boston de 1912. Sekr. de EANA 1920—22.

LEEN: La Estonto Estas Nia, ES en Nederlando. (v.)

Leeuwen (leŭven) Hendrick Cornelis, van, nederlandano, lernejestro (ĉe kristana lernejo) en Wijhe; estrarano de la provinca komitato por la kontraŭrevolucia partio. Nask. 18 majo 1884 en Venendaal. Prez. de NKEU, ĉefred. de la *Kristana Gazeto*, vicprez. de KELL. Trad. en 1933 la faman junularlibron *Jaĉjo Holm* kaj liaj amikoj.

Lefebvre, (ps. Ned Katryn), franco, estis kapitano en Versailles antaŭ la milito. Artikoloj en L. I., tre interesaj estis liaj humorplenaj raportoj pri UK-j.

Legendoj. De A. Niemojewski, el la pola trad. Br. Kuhl. 1911, 232 p., dua eld. 1923, 74 p. »Bildoj el la vivo de Palestino en la tempo de Jesuo. Generale la E-a stilo estas super kritikilo.« (P. J. C., British E-ist, 1911, p: 231.)

Legolibroj en E ekzistas de 1903, kiam aperis la *Fundamenta Krestomatio* de la lingvo E, (v.) verko preskaŭ 500 paĝa, jam plurfoje reeldonita, klasikaĵo por ĉiuj, kiuj volas ĉerpi el la malnovaj fontoj de E. En 1907 aperis *Int. Krestomatio kaj Unua Legolibro* (v.), ambaŭ de Kabe. Post la milito multiĝis legolibroj en E, inter kiuj plej famaj estas *Tra la Mondo* (v.) de Bennemann, *Universala Legolibro de Fricke*, *Nilegu de Brunulo* k. a. — *La Anekdoto* (v.) de Dreher prove enkondukis marginajn tradukojn de vortoj en 4 ĉefaj eŭropaj, kaj parte en E mem, por eviti serĉadon de malfacilaj vortoj en vortaroj. — La tipo de E-a legolibro ne posedas vorttradukojn, nek klarigojn, sed konsistas el serio da artikoloj aŭ rakontoj, plej ofte anekdotoj aŭ spritaĵoj, kaj la lernanto devas eltrovi la nekonatajn vortojn en nacia vortaro. Tiaj estas ankaŭ la plej multe uzataj legolibretoj *Karlo* (v.) de Privat kaj *Petro* (v.) de SAT. Karlo estas bonstila rakonto pri la vivo de

brava junulo; Petro estas uzata en laboristaj rondoĵoj, en kies medio okazas ĝia agado. — La kaŭzo, kial la tipa E-a legolibro senumas vorttradukojn kaj -klarigojn, konsistas en la fakto, ke la facileco de E permesas, ke la komencanta E-isto povas malhavi multan kaj penan gramatikan klarigaron kaj tamen atingi per nura legado ian gradon de perfekteco. Krome, la E-aj vortaroj estas ordinare tre maldikaj kaj malmultekostaj, tiel, ke preskaŭ ĉiu komencanta E-isto posedas almenaŭ unu plenan radikaron, kiun li (ŝi) povas konsulti uzante legolibron. — Krom la supre cititaj menciindas ankaŭ la legokajeroj eld. de la Ĉe. Instituto por ties kursfinintoj kaj la faka gazeto por E-studentoj *La Praktiko*, kiuj ankaŭ plenumas saman taskon, kiam la legolibroj. — Mankas en E vera, gradigite aranĝita lerno-legolibro kun lingva klarigaro kaj kies temo servus por enkonduki la studenton en la E-istan movadon. Tiam nun planas eldoni *Literatura Mondo* sub titolo »Nova Krestomatio« en la redakto de E. Pfeffer kaj K. Kalocsay. L. DREHER.

Leipzig. Urbo en Germanujo (Saksujo); 700.000 loĝantoj. Sidejo de la E-Instituto por la Germana Respubliko kun granda biblioteko. Konata Eldonejo: F. Hirt und Sohn. — 9-a kongreso de SAT 4—10 aŭg. 1929; ĉ. 650 partoprenantoj el 22 landoj. Kritiko de komunistaj SAT-anoj pri laŭ ili neklasbatala, oportunistisma gvidado de SAT. Likvido de la program-komisiono. Deviga abono al Sennaciulo por aktivaj membroj. BRUIN.

Leite (lejti) Tobias Rabelo, braziliano, d-ro, ing. Mortis 16 jul. 1920. Kunfond. kaj unua vicprez. de Grupo Suda Stelaro en Campinas. Aŭtoro de E-P kaj P-E Vortaroj kaj ankaŭ de *Konversacia Gvidlibro*.

Lejzerovicz (lejzeroviĉ) Izrael, (ps. Ilo, Georgo Verda) hebreo, ĵurnalisto, komercisto. Nask. 4 jun. 1901 en Lodz. Gvidanto de la E-movado en Lodz kaj unu el la plej agemaj E-istoj en Pollando. De lia E-igo li laboras en la plej diversaj sferoj de la movado. Li edukis multajn fervorajn E-istojn. Multaj prelegoj, prezentadoj, artikoloj kaj aliaj gravaj

faktoj, kiel ekz. aŭtoro de Projekto pri Int. Organizo rimarkigas la agadon de L. Kelkara prez. de la Tutmonda E Hebrea Asocio. Verkis lernolibron kaj ŝlosilon por judoj. Liaj artikoloj konstante aperadis en *Pola E-isto*, *HDE* kaj *LM*. Kiel originala verkisto li distingigas per brila satiro, kiu estas unu el la plej individuaj fenomenoj en la E-ista literaturo. Kiel tradukisto li estas en la unua vico; aperis de li *Dibuk* (mistera dramo de An-Ski) el la hebrea kaj *La Sorĉistino* el *Kastilio* (romano de Ŝalom Aŝ) el la juda lingvo, 1933. LK. F. SZILAGYI.

Lemaire (lōmer) René, franco, komercisto. Nask. 2 marto 1876 en Epernay (apud Reims). Varbita de Beaufront en aŭg. 1892, li estis lia unua kaj, ĝis 1897, preskaŭ sola kunbatalanto. Tuj interrilatis kun Z, kaj malavare helpis al eldono de kelkaj el liaj unuaj libroj. De 1898 ĝis 1902 estis sekr. de SPPE kaj de *L'Espérantiste*; krom siaj artikoloj li redaktis la kronikojn, korektis la eraroplenajn tekstojn de la korespondantoj, kaj prenis sur sin la tutan administradon. Nur dank' al li, dum tiuj jaroj, Beaufront povis sukcese plenumi siar taskon. Tiu tro granda laboro, kunigita kun lia profesia tasko malsanigis lin. De multaj jaroj, eĉ pli frue ol Beaufront, li opiniis necesaj reformojn en la lingvo. Tial en 1908 li tuj fariĝis Idisto, kaj de tiam laboris por Ido tiom, kiom ebligis lia farto. Krom artikoloj verkis filatelian F-E vortareton, 1903. L. BASTIEN.

Le Monde Espérantiste. Prop. gazeto, aperinta regule de dec. 1908 ĝis jul. 1926 en Paris. 33×25 cm. 16 p. Red. A. Fréchas.

Lengyel (lendjel) Pál, hungaro, pre-sejposedanto. Nask. 1 apr. 1868 en Szabadka (nun Subotica en Jugosl.), mortis 4 okt. 1932 en Budapeŝto. En sia 4-a jaro li fariĝis tutorfa, edukis lin lia avino. En 1883 li fariĝis pre-sisto. En 1897 li hazarde ekvidis anoncon pri la unua hungara E-lernolibro de Barabás, antaŭmendis ĝin (en kelkaj e-roj, ĉar li esperis, ke ankaŭ liaj amikoj lernos E-n, sed vane) kaj du tagojn post la ricevo li sendis leteron

al la klubo en Uppsala, kaj korespondis kun P. Nylén. Li baldaŭ fariĝis unu el la plej memoferaj batalantoj de la heroo epoko de E. La gazeto *Lingvo Internacia* troviĝis en grava krizo kaj L., presejposedanto en la urbo Szekszárd, en 1900—04 je sia propra risko eldonis (kelkan tempon ankaŭ redaktis) la gazeton. En sept. 1904 li migris kun sia familio al Parizo kaj kunfondis tie la presejon Presa E-ista Societo, kies teknika dir. fariĝis li mem. Li restis ĝis 1914 unu el la ĉefaj kolonoj de L. I., konsekvenca »fundamentisto« kaj fidela amiko de Cart. Kiam en 1905 la L. K. fondiĝis, li tuj estis elektita ĝia ano, kaj en 1910 fariĝis ankaŭ akademiano. Okaze de la militeksplozo 1914 la francaj magistratoj metis lin (kiel hungaran ŝtatanon) en internigejon kaj li restis tie kune kun la familio ĝis la militfino. Ĉiu havaĵo estis konfiskita, eĉ el la propraj verkoj restis nek unu ekzemplero. Lian kvinjaran suferadon kaj la mizeron foje-foje mildigis la helpoj de L. Moreau, Cart, Frečas kaj Hodler kaj ankaŭ du E-istaj soldatoj, troviĝantaj inter la gardistoj, faris, kion ili povis fari. En jun. 1919 li revojaĝis al Budapeŝt kaj provis rekomenci la vivon kiel ĉefkorektisto de granda presejo. En la postmilitaj jaroj li ne partoprenis la movadon aktive pro malriĉo, malsano kaj animaj postsignoj de la militjaroj. Li verkis du gramatikojn, en 1903 kunlabori kun Schwörer kaj Miletz, en 1921 kun Kalocsay. Trad. hungaren la *Fund. de E.*, 1909 kaj la ŝlosilon de Ĉefeĉ. Jam en 1899 li verkis la ampleksan *Libro de l'humorajo*, dua eld. en 1908. Trad. la rakonton de Ā. Abonyi *Malumajo*. 1906 kaj kompilis verketon *La Kalendaro*, 1907. La plimulto de liaj artikoloj aperis en L. I. (ankaŭ en ties lit. almanako), kaj en la *Jun-a E-isto*, kies red. li estis 1909—14. Artikoloj ankaŭ en *L'E-iste*, *La Revuo* kaj en L. M., kie aperis liaj interesaj *Rememoroj* (1922. kaj jan. 1923).

Leningrad (antaŭe Petrograd). Antaŭa ĉefurbo de Ruslando; 1,614.000 loĝantoj. — 15 apr. 1892 fondo de ES »Espero«. — 6-a kongreso de SAT

6—10 aŭg. 1926; ĉ. 400 partoprenantoj el 14 landoj. Honorprez. Lunaĉarski. Raporto pri E en lernejoj kaj lab. grupoj, E kaj radio, int. lab. korespondado. Tezoj pri rilatoj inter SAT kaj LEA-oj. Sovetia poŝto eldonis SAT-poŝtmarkon. BRUIN.

Leo Belmont. v. Belmont Leo.

Leono Vienano: ps. de Wiener Leo (v.).

Leo Turno: ps. de d-ro Leopold Dreher (v.).

Lerchner (lerfner) Richard, germano, administranto, antaŭe bierfaristo. Nask. 19 nov. 1886 en Geyer. Antaŭmilitite funkciis en sindikato kaj parte en lab. partio. Aktiva E-isto de 1910. Gvidis kursojn kaj kunlaboris al »Antaŭen«, organo de LEA en Germanujo ĝis 1914. Partoprenis la fondon de SAT kaj de 1923, ĝis la transiĝo de SAT al Parizo, estis ĝia adm. Iniciatis la SAT-verkon *Petro* kaj kunverkis ĝian unuan tekston.

Lernejoj. La plej ampleksaj laboroj estas faritaj por sukcesigi E-n en la lernejoj. Sukcesoj montriĝis en la plimulto de la kulturitaj landoj. E-n oni jam instruis en multegaj, ne facile kalkuleblaj lernejoj diversgradaj. Sed nur en maloftaj kazoj la instruado de E havis daŭran karakteron, kaj nur en kelkaj landoj en nemultaj lernejoj oni instruis E-n en deviga formo. Estu menciitaj kelkaj kaŭzoj de la ŝajne malrapida progreso. La lernejo estas konservativa institucio, kiu — eĉ en progresemaj landoj. — pli atentis la tradiciojn ol la postulojn de la modernaj bezonoj. Estas ĝenerala plendo pro la troŝarĝo de la lerneja programo, do enkondukon de nova fako — aŭ E aŭ alia — ne konsentas plimulto de la kompetentaj faktoroj. Preskaŭ ĉie en la mezgradaj lernejoj oni instruas kelkajn lingvojn kaj kvankam la universala akcepto de E estus la solvo ankaŭ de la lingva instruado, la transiron malfaciligas i. a. ĝuste la ampleksa instruado de la antikvaj kaj modernaj lingvoj. En diversaj landoj sekve de registar- aŭ reĝimsanĝo perdiĝis antaŭe jam uzitaj permesoj aŭ favoroj. Pri la stato de la E-a instruado orientas la artikoloj laŭlandaj, la koncernajn paĝojn montras la Indekso. (v. Instruistoj; Ligo de Nacioj; Pedagogia

valoro de E; Studentoj; Universitataj katedroj.)

L' Esperantiste, komencis aperi jan. 1898 kaj havis la jenajn subtitolojn: ĝis dec. 1903: »Organe propagateur de la langue int. E«, de jan. 1904—junio 1908: »Organe propagateur et conservateur de la langue int. E«, de julio 1908—dec. 1909: »Organe propagateur de la langue int. auxiliaire« — kaj per tio ĝi jam transiris al Ido. En jan. 1910 L'E akceptis la titolon »La Langue Auxiliaire, Organe propagateur de L'Ido« — kaj aperis tia ĝis la komenco de la mondmilito. En nov.—dec. 1918 ĝi reaperis kiel »Bulletin Français-Ido de La Langue Auxiliaire« (4 p. 22×14), kiu aperas ankoraŭ hodiaŭ. De jan. 1904—junio 1908 L'E estis oficiala organo de SFPE. Red. Louis de Beaufront ĝis junio 1903 en Epernay kaj poste en Louviers. L'E atingis tre grandan — eble ĝis nun la plej grandan — influon je la publika opinio ne nur en Francujo, sed ankaŭ en aliaj landoj kaj per ĝi estis varbitaj multaj fervoraj adeptoj. Plue ĝia apero okazis en tempo, en kiu — krom »Lingvo Internacia« — aperis neniu alia E-a gazeto. Z kaj la plej eminentaj E-istoj el la tuta mondo uzis ĝin kiel parolilon. De marto 1899 L'E havis tut-E-an aldonon »supplément de L'E«.

P. TARNOW.

L' Esperanto. Gazeto de la itala E-istaro, en la unua formo fondita jam en 1902. La gazeto kelkfoje ŝanĝis sian titolon kaj havis diversajn eldonantojn. Nuna formato 52×37. Aperas ĉefe en itala lingvo, kun interesa enhavo. Red. N. La Colla. (v. p: 171, 260.)

Leteroj al Brigito. La socialista partio, ĝiaj principoj kaj ĝiaj taskoj. De J. B. Séverac. 1933, 207 p.

Levenzon L., ruso. Nask. 25 jun. 1887 en Ekaterinoslav. E-isto de 1906. En 1909 e'donis »Poŝtkart-jurna'ono«. Verkis multajn E-ajn versajojn, teatraĵojn, ktp., kiuj aperis en »La Ondo de E«, »L. I' kaj »Verda Stelo«.

Libeks Rudolfs, latvo, instr. Elmigris dum la 1890-aj jaroj Brazilon, kie mortis. Unua pioniro de E en Latvlando. Verkis la unuan lernolibron por latvoj. Ĝi estis la unua lernolibro, pre-

sita ekster Varsovio, aperis 1889 ĉe Sichman, Riga, notita en la listo de unuaj E-libroj kiel n-ro 29.

Liberiga Stelo. Int. organizo lab. E-ista (antaŭe nomata Paco-Libereco). fondita en 1906. (v. Laborista movado.)

Libero. Monata revuo de movadoj por reformigo de la vivo. Interesere daktita. Aperis en 1925—26; 244 p. Formato 29×31. (BIL, p: 319.)

Liberpensuloj. Sekvantoj de l' doktrino de liberpensado, deveninta el Anglujo en la 18-a jarcento. La liberpensado volas por sia celo ricevi objektivajn rezultojn per senantaŭjuĝa esplorado de la naturo, de l' materio, de la homara historio kaj precipe de la sociologia historio. Tial ĝi preteras la malhelpojn de la libera pensado, evoluigintajn dum la jarcentoj; superstiĉon, religion, ŝovinisman kaj naciecon. La liberpensuloj konsideras religion kaj naciecon ĉefaj kaŭzoj de la militoj kaj malhelpo de homa progreso. Pro la lasta kaŭzo ili jam frue kontaktiĝis kun E kaj ankaŭ nun uzas ĝin por siaj celoj. — Dum la 3-a UK en Cambridge fondiĝis Int. Societo E-ista de Liberpensuloj; oni reorganizis ĝin en 1923 sub la titolo Int. Ligo de Liberpensuloj. Ĝia celo estas unuigi la samcelanojn, disvastigi liberpensadon, propagandi E-n en liberpensulaj rondoj kaj eldoni E-lingvan liberpensen literaturon. 1908—14 la movado havis sian propran organon *Libera Penso*, en 1925—27 la *Liberpensulo*. Post 1927 la Ligo ne plu funkcias. — La Internacio de la Proletaj Liberpensuloj, fondita en 1925, kies celo estas liberigi la penson el mistikaj ideologioj kaj per tio plirapidigi la finon de la klasbatalo, ankaŭ favoras E-n, kune kun ĝia prez. prof. Hartwig.

F. CSUTAK.

Aktivuloj estis ĝis 1914 Rene Deshays, post la milito Kurt Hubricht. — Antaŭ 1914 ankaŭ la int. asocio Paco-Libereco agis kontraŭ la religio kaj eldonis broŝuron »La krimoj de dio«, de S. Faure. — En SAT estis Ateista Sekcio, kiu dum la jaroj 1929—33 havis ateistan paĝon en Sennaciulo. Ĉe SAT ankaŭ aperis broŝuro »Kontraŭ dio« (reprezo de ateista kajero

de SR). — En la Komunista Biblioteko (Moskvo 1929—30) aperis: Sejnman, »Milito kaj religio«, Lenin, »Pri religio«, Buharin, »Financa kapitalo en la papa mantelo«. — Ankaŭ EKRELO eldonis kelkajn broŝurojn kontraŭreligiajn. — Tre vaste uzis E-n por sia agado la Unio de Militantaj Ateistoj (UMA) en Sovetio. Ĝi eldonis ampleksajn E-lingvajn resumojn de siaj gazetoj Militanta Ateismo (1931, 206 p.) kaj Anti-Religiulo (1932, 244 p.) aperigis broŝurojn: Lukačevskij, »Marks kaj Engels pri la religio«, Jakroslavskij, »Respondoj al ekstersovetiaj ateistoj«, Servud, »La vero pri persekutoj kontraŭ religio en USSR«, kaj »UMA en USSR kaj ĝia laboro.« Krome ĝi korespondis E-e kaj dissendis E-lingvajn ciklostilitajn cirkulerojn pri ateisma agado.

G. P. de BRUIN.

Libroj. E diferenciĝas de la naciaj lingvoj ankaŭ per tio, ke dum la lastaj estis unuavice parollingvoj kaj el tiuj naskiĝis la skrib- kaj literaturaj formoj, E jam naskiĝis kiel skriblingvo, ĝiaj vivo kaj unueco estasigitaj al la skribo kaj nur duavice al la parolo. La unua E-libro naskiĝis pli frue, ol la unua interparolo, se ni ne kalkulas al tio la konversacion en la kadro de la familio Z, kie la lingvo ankaŭ parole estis elprovata.

Kompreneble la unuaj libroj en E estis gramatikoj kaj vortaroj. Sed jam la 14-a libro estis literaturajo kaj de tiam ambaŭ specoj de libroj aperis proksimume samkvante. La unuajn librojn eldonis la aŭtoroj aŭ tradukintoj mem. Tamen gramatikoj kaj vortaroj estis jam eldonataj de profesiaj eldonejoj antaŭ ol literaturaj verkoj. La serioza eldono de E literaturaj komenciĝis per la fama kontrakto inter de Beaufront kaj Z, post kio de B. kun helpo de Bourlet kontraktis kun la firmo Hachette et Cie, Paris pri starigo de E-fako. Ĝis 1904 la firmo ne havis konkurant, tiam Lengyel fondis en Paris la Centran E-Presejon (v.) kaj poste kun Cart kaj aliaj la Presan E-Societon por egalpezi la »novismajn« klopodojn de Bourlet. Tamen, Hachette restis ĝis la milito la plej signifa el-

donejo, regule aperigante kelkajn gazetojn, multajn librojn. Tre multe laboris ankaŭ PES, ekde 1910 la librofako de Brita Esperantista Asocio kaj de la firmo Ellersiek (v.).

La plejparto de la antaŭmilitaj libroj estis malgrandaj kajoroj, ne superantaj kvindek paĝojn. Ili celis plejparte esti daŭrigaj perfektigiloj post ellerno de kurso kaj lego de unua leĝolibro. Ofte oni ankaŭ presis partojn el klasikaj verkoj por kvazaŭ mistifiiki la neesperantistan publikon pri la ekzisto de tiuj verkoj en E. Nur tre malmultaj libroj el la antaŭmilitaj eldonitaj povas esti komparataj kun la literaturo nacia. Al ili apartenas: »La Faraono« de Prus, »Fabiola« de Wiseman, originalaj romanoj de Vallienne kaj Luyken, ktp.

La milito forblovis preskaŭ ĉiujn eldonistojn. Post ĝia paso restis sur tereno nur la firmoj BEA kaj Ellersiek. Tamen ne ili estas, kiuj daŭrigis la aperigadon de bonaj libroj, sed la E-fako de fama germana libroj Ferdinand Hirt und Sohn (v.). La libroj de ĉi tiu libroj tute diferencis de la antaŭmilitaj eldonaĵoj. Ili estis ne nur seriozaj, kelkcentpaĝaj verkoj, sed estis diferenco ankaŭ en la ekstera aspekto de la libroj. La antaŭmilitaj ĉefe francaj eldonaĵoj estas ĉiuj presitaj sur malbona ligna, la kovrilo sur simpla ruĝa aŭ alikolora papero, dum la eldonaĵoj de Hirt aspektas kiel zorge dorlotitaj infanoj. Ĉi tiu diferenco lasis grandan impreson ankaŭ ĉe la poste eklaborantaj eldonejoj. La gvidrolo en la libroeldonado post la milito transiris el francaj manoj en germanajn, aldonante al la E-libroeldonado la unuarangan teknikon de la germana pres- kaj eldono. En 1925 ankaŭ Heroldo de Esperanto fondis sian libroeldonan fakon kaj de tiam la E-libro daŭrigas sian evoluon. Unu post la alia aperas gravaj kaj seriozaj libroj, kies ekstero kaj enhavo aligas al la E-movado multe da libroŝatantoj. La E-libro fariĝis unu el la plej bonaj propagandiloj por la lingvo mem. Sed ĝi ankoraŭ ne okupis sian indan lokon.

La meza eldonnombro de iu E-libro estas 2000. Tamen, la plejparto

de la eldonejoj presas ne pli ol 1000 ekzemplerojn kaj unu el niaj plej grandaj postmilitaj eldonejoj en la lasta tempo de sia aktiveco presis el iuj libroj nur po 600 ekzempleroj. La plej granda vendita kvanto el iu E-libro literatura estas laŭ nia scio 5000 dum kelkaj jaroj kaj 1500 en la unuaj du jaroj. Tial okazas, ke la E-libroeldonado ne prenas en la manon grandaj alilingvaj eldonejoj, kreante portio E-fakojn. Se tamen tio okazas ufoje, tiuokaze tiu E-fako vivas plejparte per la profito, kiun donas la eldonataj prilingvaj verkoj kaj per kiu eble oni kovras la perdojn ĉe la literatura fako. Tion plej multe karakterizas la sorto de la E-fakoj ĉe la Verlag Steyermühl en Wien kaj Rudolf Mosse en Berlin. La unua komencis per eldono de malgrandaj E-gramatikoj, vortaroj, ekzercoj. La verkoj eldonitaj simple, sed tre malkare, sukcesis kaj post tio la eldonejo intencis transiri al eldono de literaturaj verkoj. Post la dua verko la eldonejo devis formeti sian intencon »al pli bonaj tempoj« kaj decidis ne plu eldoni provizore iun novan volumon de sia biblioteko. La firmo Mosse en 1926 fondis E-fakon, decidante eldoni serion de malgrandaj, plaĉaspektaj libroj, vendante dek numerojn por 4 markoj afrankite. Laŭ la planoj estis necesa la eldonnombro de 10.000 ekzempleroj por ne havi deficiton. Malgraŭ la ĝis tiam ne okazinta grandstila reklamo, la firmo ne havis la necesan kvanton da abonoj. La dua serio estis kalkulata nur je 5000 abonantoj, sed ankaŭ tiu kvanto ne estis vendata kaj tial la firmo ĉe la 24-a numero ĉesigis la eldonadon de tiuj vere bonstilaj kaj interesaj verkoj.

La verŝajna kaŭzo, ke la E-libro ne vendiĝas grandkvante, estas unupartite la ĉiama granda kvanto de eternaj komencantoj, aliparte la ega grandeco de la merkato (la tuta mondo — dum por aliaj eldonejoj nur po unu aŭ du landoj), kio ege malfaciligas la konatigon, reklamadon kaj eĉ acetadon de la E-libro, sed neniu kaŭze la manko de malkaraj bonaj libroj. Tiun aserton pruvas la sorto de la Mosse-eldonejo kaj tio, ke AELA malgraŭ plej malkaraj libroj, plej

granda reklamo, apenaŭ atingis en la unua jaro la minimume necesan nombron de 1000 membroj. Tion pruvas ankaŭ la lastatempa sorto de Populara E-Biblioteko, kies eldonantoj kalkulis pri la eldonkvanto de 3000 ekzempleroj kaj kiu eldonkvanto, akompanate de nesufiĉe eltenema kapitalo, bankrotigis la entreprenon.

La nuna krizo de la mondekonomio kompreneble grave influis ankaŭ la konsumkapablon de la E-istaro. Tiu malbono estos forigebla nur, se la gvidantoj sukcesos konvinki la E-istaron, ke la evoluo kaj grandeco de la E-literaturo dependas ne de la laboremo de kelkaj entreprenoj, sed de tio, ke E-istoj legu la interesajn verkojn aperintajn, en E mem kaj ne en la nacia lingvo, kaj ke la plej taŭga donaco estas E-libro. Al ĉi tiuj du konvinkoj devas aliĝi ankaŭ la plifaciligado de la ebleco de propraĵo de E-libroj. Tio povas okazi trimaŭniere: per bone organizita reto de revendistoj, per kvazaŭa kooperativo por eldoni kaj aĉeti E-literaturon kaj per la maniero, kiun UEA faris en la postmilitaj jaroj.

La apliko pligrandskala de la unua maniero estas ebla nur en landoj, kie la E-movado estas relative torta (Japanujo, Nederlando, Svedujo). En aliaj landoj la organizo de tia reto kostus pli da mono kaj peno, ol la tuta atingebla rezulto valorus. En ĉiuj aliaj landoj do estus ebla nur la dua maniero, kies sanan evoluon tamen malhelpas la motivita malfido de la E-istaro kaj la ofta principa kontraŭstaro de la ekzistantaj librejoj, kiuj timas pri sia vivo pro la disvastigo de organizado, kiu finfine elpuŝus ilin mem. La libropremiado de UEA estas ideo, kiu multe estis kontraŭbatalata. La argumentoj de tiuj kontraŭbatalantoj estis, ke tiu maniero kutimigas la homojn ricevi librojn senpage kaj ne aĉeti ilin kaj ke la eldonejoj ricevas nur tre malfaltan prezon por siaj libroj. Ricevante senpage librojn, plejparto de ricevantoj eble opinias, ke ili ne plu aĉetu libron, ĉar ili ja »faris sian devon«. La porparolantoj vicigis tiun grandan nombron da novaj E-istoj kiuj ricevas nur per tiu premio-libro

unuafaje kvazaŭ impulson por aĉeto de novaj libroj kaj ke la transpreno de granda, ofte nevendebla kvanto multe helpas la koncernan eldoniston.

Ĉiuokaze la eldono de E-libroj en la nuna tempo estas ankoraŭ plie afero de entuziasmo, ol tiu de negocio. La karakterizaj ecoj de la libroeldonado komprenebligas, ke eĉ la eldonejoj, laborantaj kun profito, havas sian profiton en la ĉiam pligrandiganta librostoko, anstataŭ en necesaj monsumoj kaj tial la kapitalo, investita en E-libroeldonejojn nur plej malfacile kaj tre malofte povas pagi rentumon, ĉar ĝi ne alportas pli da profito, ol kiom estas la administraj kostoj mem.

Laŭ la statistiko de la ECO en 1889 estis 29 E-libroj, en 1894 88, en 1899 123, en 1904 211, en 1909 entute 1330 libroj. Laŭ BIL ĝis 1928 eldoniĝis ĉ. 3200 libroj en E (krom la gazetoj). Nombro de la en E aperintaj libroj laŭ la Bibliografia Servo de UEA: 1931—138, 1932—145, 1933—97 libroj.

Gravaj antaŭmilitaj eldonejoj: Hachette et Cie, Paris; Presa Esperantista Societo, Paris; Ellersiek und Borel, Berlin; Internacia Socia Revuo, Haga; Ondo de Esperanto, Moskva; Brita Esperantista Asocio, London.

Aktive laborantaj eldonejoj inter 1921-30; (eldonintaj pli ol unu volumon dum unu jaro): Esperanto Publishing Co. Ltd. London; Eldona Societo Esperanto, Stockholm; Friedrich Ellersiek, Berlin; Ekrelo, Moskva; Eldona Kooperativo de SAT, Leipzig-Paris; Esperantista Centra Librejo Paris; Heroldo de Esperanto, Köln; Ferdinand Hirt und Sohn; Leipzig; Hungara Esperanto-Instituto, Budapeŝt; Japana Esperanto Instituto, Tokio; Rudolf Mosse, Berlin; A. Paolet St. Vito al Tagliamento; Steyerrmühl Verlag Wien; Thieme et Cie, Zutphen.

En la lastaj du jaroj plej aktivaj eldonejoj, eldonintaj almenaŭ po du libroj dum jaro kaj laŭ la vico de ilia aktiveco: Literatura Mondo, Budapeŝt; Ekrelo, Moskva; Populara Esperanto Biblioteko, Amsterdam (bankrotinta en 1934, fondita en 1933);

Eldona Societo Esperanto, Stockholm; Esperanto Publishing Co. Ltd., London; Japana Esperanto Instituto, Tokio; Eldona Kooperativo de SAT, Paris (ne kalkulante la duan eldonon de la Plena Vortaro); Thieme et Cie Zutphen; Heroldo de Esperanto, Köln.

v. la artikolojn pri Bibliotekoj; Literaturo; eldonejojn sub iliaj nomoj.

Libro de P' Humoraĵoj. Verkita de P. Lengyel. 1900, 208 p., dua eld. 1908, 197 p., kun 54 bildoj. Anekdotoj kaj aliaj bonhumoraj rakontetoj kaj ŝercoj, Simpla, klasika stilo.

Lichtenwallner Viktorino, instruistino en Maribor (Jugosl.) Prez. de EK en M., prop-isto. Vizitis plurajn UK-jn. Artikoloj en Konkordo, La Suda Stelo ktp.

Lidin (Moĥov) Ivan Grigorieviĉ. sovetiano, ruso. Nask. 1891 en Ardatov (Mordovio). E-isto de 1914. Aŭtoro de kelkaj rusaj E-lernolibroj (1925, 26, 27), ankaŭ por blinduloj. En 1924—25 li eldonis E-lernogazeton por rusoj »E hejme«, Kazanj (Tatario). Artikoloj en SEU kaj SAT-organoj. Membro de CKSEU. 1925—28.

Lidl Rudolf von, aŭstro-germano, pens. oficisto. Prop-isto (nun 71-jara), unue en Silezio, poste en Stirio, nun en Salzburg, jam de 25 jaroj. Dediĉas sian tutan tempon kaj multan monon al E. Multaj kursoj, paroladoj.

Liebeck (libek) Siegfried, germano, d-ro jura, advokato kaj notario. Nask. 12 febr. 1885 en Königsberg. Propagandas inter juristoj. Verkis: Jurista Terminaro, G-E lingva, 1931.

Liem Tjong Hie, javano. Nask. 15 jan. 1906 en Semarang, Java. Li studis en tieaj nederlandaj lernejoj. E-isto de 1919. Tradukis: Javaj Legendoj kaj fabloj, 1924; kaj Historio de Saidjah kaj Adinda de Multatuli, 1927. Fond. kaj red. de Hinda E-isto.

Ligilo. Monata revuo por ĉeĥoslovakoj. Fondita en 1930. Formato 25×18

Ligilo por Vidantoj. De 1925 preskaŭ ĉiuare foje eldonita kajero de la blindaj E-istoj por informi la vidantojn pri iliaj vivo kaj agado. Red. H. Thilander, Stockholm.

Ligo de Nacioj. Jam en la unua kunveno de la Ligo en 1920 kelkaj

delegitoj proponis rekomendan rezolucion por E, kun peto, ke la sekretario preparu raporton. La propono estis prokrastata. En la sekvanta jaro, 1921, simila propono estis farata, petanta denove pri enketo farota de la sekretario. Dume la vic. sekr. ĝenerala de la Ligo, d-ro Nitobe (v.) estis vizitinta la kongreson en Praha kaj estis favore raportinta pri siaj spertoj. La sekvo estis, ke la supre nomita propono estis akceptata kaj ke la sekretario ricevis komision prepari raporton. Vasta enketo estis entreprenata kaj la Konferenco pri E en Lernejoj (v. Konferencoj), okazinta en apr. 1922 en la palaco de la Ligo liveris same tre utilan materialon. La raporto de la sekretario do estis prezentata al la tria kunveno de la Ligo en sept. 1922. Ĝi estis oficiale akceptata, sed la demando pri enkonduko en lernejoj estis transdonata al la Komisiono por intelekta Koperado. La rezolucio, kiun tiu komisiono faris en aŭg. 1923, estis iom stranga: ĝi opiniis, ke antaŭ ĉio ĝi devas rekomendi la studadon de vivantaj lingvoj, kiel unu el la plej potencaj rimedoj por la intelekta alproksimiĝo de la diversnaciaj homoj kaj do ne povas favori E-n. Tamen klopodo akceptigi tiun rezolucion, nur bazitan sur politikaj intrigoj, en la kunveno de la Ligo mem, ne sukcesis kaj la afero do restis kia ĝi estis. La raporto de la sekretario ankaŭ entenis paragrafon por rekomendi faciligon al E en la int. telegrafado. En pli favora momento, en 1924, la persa delegitaro proponis rezolucion, rekomendantan la traktadon kaj la tarifon de tiel nomata »klara lingvo« (ne kodo) por E. Tiu rezolucio estis unuanime akceptata kaj ĝi estis do la unua interŝtata rekonno de E kiel uzata lingvo. En 1925 la Universala Telegrafunio en sia tutmonda konferenco en Parizo sekvis la rekomendon de la Ligo kaj ŝanĝis sian regularon tiel, ke E estas allasata kiel »klara« lingvo flanke de la latina. — La E-istaro dankas la sukcesojn de tiu ĉi kvinjara pacienca laboro en unua loko al E. Privat.

Laŭ la »Historio kaj Organizo de la E-movado« de J. R. G. ISBRÜCKER

Ligo Esperantista. La unua provado por organizo de la E-istoj, 1890—94.

Liftenstejno. Eŭropa ŝtato (12.000 loĝantoj), kiu dufoje eldonis oficialajn poŝtkartojn kun E-a surskribo kaj trifoje E-lingvajn prospektojn. Kvaŝaŭ rekompence multaj E-istaj propoj faris turisman reklamon por la princlando ankaŭ en multaj nacilingvaj gazetoj. Efektiviganto de tiu ĉi prop. maniero estas R. Kreuz.

Liljer Aleksandro, ruso, En 1928—29 troviĝis en Mangurio estinte ruĝ-armeano, en 1930—31 restadis en Arhangelsk en politika ekzilo, de kie li revenis malsana. E-isto de 1924. En 1926 fondis en Moskva E-Asocion »Reciprokhelpeo«, kies devizo estis: Ni helpu la alian. La asocio estis baldaŭ malpermesita. Aŭtune de 1927 efektivigis rondvojaĝon por E: dum unu monato ĉ. 10000 kilometroj.

Lindhagen Carl A., svedo, urbestro (magistratestro kaj ĉefjuĝisto) de Stockholm, socialdemokrata parlamentano. Nask. 17 dec. 1860 en S. En 1911 li metis la problemon de tutmonda lingvo al la decido de la sveda parlamento; revenis poste kun sia propono preskaŭ ĉiujare, de 1928 klare proponante E-n. Sekvo: en 1929, 1930, 1931 la parlamento voĉdonis sumon da 2900 kronoj por instruistaj kursoj de E. Li vizitis la UK en Danzig-Warszawa, 1927. Partoprenis la kurson de A. Cseh por svedaj parlamentanoj. Prelego dum la Somera Univ. 1934.

Lingvaj Respondoj, verkitaj de Z. unue aperintaj en La Revuo. Plena kolekto: 1925, 94 p. »Malnovaj kaj novaj E-istoj ĉiam trovas en tiuj respondoj ĉu bezonatan klarigon, ĉu la spiriton de sia majstro, netrudema, sed liberama, mirinde klara, prudenta kaj pacigema. Flanke de P Fundamento, de P Fund. Krestomatia, ĝi estas la tria bazo de nia konstruaĵo.« (G. S., E' 1926, p: 56.)

Lingva Komitato kaj Akademio. I. Historio. En la unua UK en 1905. estis starigata »Komitato simple lingva kun Dro Zamenhof kiel prezidanto, por konsiligi kun li pri ĉiuj demandoj rilataj al la lingvo«.

Laŭ propono de Z mem estis elektataj 102 membroj el 28 nacioj, kaj rektoro Boirac efektivigis direktadon de tiu L. K.

En la 2-a UK en 1906 Z petis, ke la L. K., kiu estis elektita provizore nur por unu jaro, restu kia ĝi estas, kiel definitiva komitato, kaj ke la prezidanto konservu sian postenon.

En 1908 por forigi la malutilon de la granda nombro de la L. K., la prezidanto proponis dispartigi ĝin, formante en ĝi konstantan superan komisionon aŭ Akademion. Per cirkulero la prezidanto sendis projekton de regularo, kiu estis akceptata de la L. K.-anoj, kaj ne multe diferencas de la nuna alprenita en 1912.

II. Regularo. a) La L. K. konsistas el lingvaj kompetentuloj, kies nombro ne estas limigata. Ili estas proponataj de la E-societoj aŭ grupoj, kaj de anoj de E-institucioj; la Akademio elektas la kandidatojn post ricevo de la opinio de la nacia societo de ĉiu kandidato, kaj de respondo de tiu kandidato al demandaro koncerne iliajn prilingvajn kompetentecon kaj opinion.

b) La L. K.-anoj estas elektataj de la L. K. per absoluta plimulto kaj ili konservas sian oficon dum 9 jaroj. (laŭ la regularo de 1906 ili estis ĉiamaj).

c) La akademianoj, kies nombro ne povas superi 18, estas elektataj de la L. K. per absoluta plimulto laŭ listo starigita de la Akademio mem, inter la membroj »montritaj per speciala lingva kompetenteco kaj kiuj povas efike partopreni la laborojn de la Komitato.« Ili estas elektataj por 9 jaroj kaj rebalotataj ĉiun trian jaron, po triono. (En 1919 okazis la elektoj, kiuj ne povis okazi en 1914).

d) Saman estraron havas Akademio kaj L. K., kiu konsistas el prezidanto, 2 vicprezidantoj, 1 ĝenerala sekretario, se necese (ĝis nun ne estas) kaj direktoroj de la Laboraj Sekcioj; ili estas elektataj de la Akademio por 3 jaroj, kaj novaj elektoj okazas ĉiun trian jaron post reelektado de la triono de la Akademio.

III. Laboraj Sekcioj. En 1908 estas fonditaj konstantaj komisionoj (nun nomataj sekcioj) por Komuna

Vortaro, Gramatiko, Teknika Vortaro. La Sekcio por internaj kaj aliaj aferoj ne plu ekzistas. Laŭ la regularo oni povas, laŭbezone, fondi aliajn.

Sekcio de Komuna Vortaro. Estis unue prezidata de prof. Cart; en 1912 ĝi fariĝis Sekcio pri Vortaro kun du subsekcioj: Komuna lingvo, direktata de Elb, kaj Teknika lingvo, de Verax. Post morto de Elb en 1913, Grosjean Maupin fariĝis direktoro de la Sekcio pri komuna vortaro, kaj la Sekcio pri teknikaj vortaroj fariĝis sendependa subdirekto de Verax.

Jen listo de la laboroj, kiuj estis publikigataj. 1906, Zamenhofaj Vortoj. En 1906 la prez. de L. K. petis kelkajn membrojn, ke ili ĉerpu el Hamleto ĉiujn radikojn netroveblajn en Universala Vortaro. En 1907 estis kreata Subkomitato por fari saman laboron pri aliaj verkoj de la Majstro. Tiu listo estis publikigata de Wackrill en Oficiala Gazeto n-ro 2, kaj en aparta broŝuro. Simila laboro estis farata de Boulet (2.000 novaj vortoj) pri la verkoj de Bein kaj ankaŭ publikigita en broŝuro.

1906—1909, Propraj nomoj. En 1906 Moch estis komisiata por raporti pri tiu demando. Li redaktis la raporton en 1907, kaj subkomitato estis elektata por daŭrigi la laboron (Beaufront, Bein, Matton, Millidge, Moch, Schröder); laboradis nur Bein, Moch kaj Schröder, kiuj ne ĉiam interkonsentis. Fine, raporto estis redaktita de Moch, kaj publikigita en Of. Gaz. 1909, kun listo de propraj nomoj geografiaj kaj personaj.

1906—1913, Korekto de eraraj tradukoj en U. V. En 1906 estis starigita komisiono por studi la dubajn naciajn tradukojn en U. V. Ĝi finis sian laboron en 1908, kaj estas publikigitaj en Kolekto de la Akademio, broŝuroj entenantaj la erarajn tradukojn en angla, franca, germana, pola kaj rusa lingvoj.

1908—1929, Oficialaj Aldonoj al U. V. La ĉefa tasko de L. K. estas oficialigi novajn vortradikojn proponitajn de la Sekcio de Komuna

Vortaro, post ekzameno de la Akademio. Jam en 1906 Huet estis komitata por kolekti la radikojn aldonotajn al la U. V. La unua aldono estis publikigata en 1909 kaj entenis 800 radikojn; preskaŭ ĉiuj devenis de la verko de Wackrill (vidu Z vortojn). De tiu dato aperis 4 aldonoj: la dua, kvankam preparita de 1914, aperis en 1919 kaj entenis 312 radikojn; la tria en 1922 entenis 193 radikojn; la kvara en 1929 entenis 122 radikojn. Ili estas publikigitaj en O. G. (en 1929 la prefikso mis estas oficialigita).

Ĉar la nombro de la radikoj de U. V. estas ĉ. 2.800 (kun antaŭparolo, kaj gramatiko, ktp.) nun la nombro de oficialaj radikoj estas ĉ. 4200.

1922, Vortaro de la Oficialaj Radikoj. Publikigita en 1922 en la Kolekto de la Akademio. Entenas ĉiujn oficialajn radikojn; ĝi montras per specialaj preslitoj la plej gravajn vortojn, kiujn unue devas sciĝi lernantoj de la lingvo. (prof. Cart kaj Grosjean-Maupin aŭtoroj).

1924—1927, Oficiala Klasika Libro de Esperanto. Entenas ĉiujn oficialajn radikojn kun nacilingvaj tradukoj. En 1924 aperis la tradukoj angla, franca, germana; en 1927 la tradukoj itala, hispana kaj portugala (ĉ. 2850 vortoj) kaj radikoj ĝenerale internacie kompreneblaj, t. e. de eŭropaj lingvanoj, ĉ. 1.200 vortoj. Publikigita en apartaj broŝuroj de la Kolekto de la Akademio.

1927, Pri la landnomoj. En 1922 la L. K. rifuzis oficialigi la sufikson «io» por la nomoj, kium uzis kelkaj gazetoj. Longa polemiko okazis. Fine prof. Cart publikigis en la Kolekto de la Akademio broŝuron titolitan: Pri la Nomoj: la sistemo de dro Zamenhof, sekvata de rimarkoj pri la propraj nomoj en E kaj ilia transskribo.

Jen listo de la ĉefaj aliaj laboroj nepublikigitaj: 1906 — Uzado de la literoj sursignitaj en telegrafio. — 1907 — Uzo de la formoj amintas, ktp. — 1910 Kritika esploro de la Komuna Vortaro. — 1911 Gramatikaj karakteroj de la radikoj, kaj principoj de neceso kaj sufiĉo prezentataj de Saussure. —

1912 — Pri la litero W. — 1913 — Listo de komune uzitaj vortoj, kiuj troviĝas en ĉiuj naciaj vortaroj kaj kontraŭ kies uzado neniu protestis; listo de internaciaj vortoj, kiuj troviĝas en la 3 ĉefaj E naciaj vortaroj, kaj apartenas plej-rajte al E laŭ la 15-a regulo. — 1925 — Pri la pseudosufiksoj (aci, ici, uci, ek, ent, en ktp.; konkludo estas, ke oni ne povas nun solvi la demandojn per unu nura regulo).

Sekcio de Gramatiko. Estas unue prezidita de Grabowski, kaj poste, en 1924 de Lippmann. Ne estis konstanta personaro en tiu sekcio, kiu mem ne efektivigis specialan laboron. Nur la sekcio kolektis kaj plej ofte publikigis en O. G. ĝis 1914, la verkojn de L. K. anoj pri temoj, kiuj interesis ilin. Jen la ĉefaj el tiuj verkoj:

1910. Eggleton, pri la prepozicioj; Saussure pri derivado; Hankel pri Gramatiko pli detala; Höveler pri uzo kaj signifo de prepozicioj. — 1911 Saussure: logika bazo de vortfarado; Zamenhof, pri partcipa substantivo, nomoj de landoj, okupita kaj okupata, daŭri kaj ĉesi. — 1912. Artikoloj pri senco de la partcipa sufikso; pri akuzativo post anstataŭ; pri vortoj kun ĉi; pri senco de ŝati; pri elparolo en teorio kaj praktiko; pri uzado de ambaŭ; pri senco de certa; pri plena vortarego; pri duoblaj konsonantoj. — De 1924 la direktoro Lippmann publikigas en sia ĉiujara raporto gramatikajn monografiojn: 1925, pri uzado de la refleksiva pronomo; 1926, pri la pasivaj partcipoj; 1927, la adjektivo atributo kaj la adjektivo predikato; 1928, la komenclitroj en E; 1929, la deksex reguloj de gramatiko laŭ Behrendt.

Sekcio de teknikaj vortaroj. Estas unue prezidita de Saussure, kiu fondis en Genevo Scienca Oficejon, kies celo estis kolekti laborojn de ĉiuj membroj de Scienca Asocio laŭ plano bazita sur la Bibliografia Klasigado decimala. Ĉiujare devis esti publikigata listo de faritaj vortoj.

Sed jam en 1909 mono kaj tempo mankis por tiu publikigado. Saussure proponis krei »Akademian Komi-

siono» por oficialigi la vortojn proponitajn de »Teknika komisiono«, kiu ankaŭ donus konsilojn al la vortfaristoj. Rollet de l' Isle, elektita direktoro de tiu komisiono, organizis ĝin, kaj en 1910 aperis en Sciencia Revuo la Konsilaro por la Farado de la Teknikaj Vortoj. Poste tiu komisiono laboradis pri la vortaro de la puraj sciencoj, kaj publikigis en Sciencia Gazeto Kemian Nomenklaturon kaj parton de la vortaroj de Kemio, Fiziko kaj Mekaniko.

En 1920 d-ro Corret estas elektita direktoro de Sekcio pri la Sciencaj kaj teknikaj vortaroj, kaj proponis starigi dek ĝeneralajn fakojn kaj subfakojn; sed li ne sukcesis funkciigi tiujn aranĝojn.

En 1922 Corret pro troa okupiteco estis anstataŭata de Rollet de l' Isle. La Sekcio ricevis helpon de la Sciencia Asocio. Li klopodis varbi fakestron por ĉiu fako, kaj iom post iom sukcesis trovi 17 el ili. Plie li proponis metodojn de publikigado de la vortaroj, kiu ebligis ilian uzon de ne E-istoj, kaj klasigis sciencojn kaj teknikojn laŭ terminologia vidpunkto. (I. Raporton al la 18-a U. K.)

IV. **Tasko de Akademio kaj L. K.** Estas redaktita kaj aprobita de L. K. la sekvanta deklaro pri la rolo de L. K.: «La tasko de L. K. estas zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evoluon. Ĝi do esploras ĉiujn lingvajn demandojn, kaj solvas ilin laŭ la suprediritaj principoj. Neniel la Fundamento kaj la Lingva Komitato povas esti baro por la normala evoluo de la lingvo, kiun ili kontraŭe certigas.»

La Akademio esploras ĉiujn demandojn elektitajn de ĝi mem aŭ senditajn de ĝiaj komisionoj, aŭ prezentitajn de almenaŭ 5 L. K.-anoj. Se pli ol unu triono de la komitato malaprobas decidon de la Akademio, ĝi estas denove pridiskutata de la Akademio.

V. **Naciaj Subkomitatoj.** Devus esti organizita en ĉiu lando Nacia Subkomitato, kies membroj estas la L. K.-anoj de tiu lando, kaj kies tasko estas esplori la verk-

ojn aperintajn en la lando, sendi rimarkojn al aŭtoro, elĉerpi interesajn ekstraktojn el tiuj rimarkoj por »Oficiala Bulteno«, kaj eventuale fari proponojn al Akademio. Tiuj komitatoj povas ankaŭ helpi la propagandajn societojn por organizo de ekzamenoj kaj diplomoj.

En 1912 ekzistis tiaj komitatoj en Danujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Italujo, Rusujo, Usono, Finnlando, Flandrujo, Katalunujo, Meksikujo, Nederlando, Svisujo. Dum la milito ili malaperis. En 1924 la prezidanto de Akademio esprimis la deziron, ke ili estu restarigitaj por prepari laboron de L. K. De 1925 franca kaj germana subkomitatoj restarigis, sed ili preskaŭ nenion faris pro malfacileco organizi tian laboron.

VI. **Korespondantoj.** Akademio havas la rajton elekti ĉe ekster la L. K., se bezone, Akademiajn Korespondantojn, kiam mankas kompetentulo en la L. K., pri lingvo ne sufiĉe aŭ tute ne reprezentata, aŭ pri fako necesiganta specialan lingvan kompetentecon. En 1933 estis korespondantoj por teknikaj vortaroj, kaj la lingvoj rusa, kataluna, ladina, pola, portugala.

VII. **Premioj.** Akademio rekompencas verkojn rimarkindajn laŭ la stilo. Pri tiuj verkoj ĝi decidas laŭ proponoj de speciala komisiono. Nur la membroj de L. K. povas prezenti tiajn verkojn. La komisiono estis unue prezidata de Cart, poste de Privat. Listo de la premiitaj verkoj de 1914 ĝis 1928 estas publikigita en la Raporto de la prezidanto de Akademio al UK de 1929.

VIII. **Financoj.** Ĉiujare estas prezentata al U. K. la kalkuloj de la Akademio. La enspezoj konsistas el donacoj de E-istoj (en 1930 200 Sv. Fr.) kaj subvencio de ICK: (500 Sv. Fr.); elspezoj konsistas el poŝtelspezoj, presajoj, salajro de sekretario. La buĝeto estas ĉ. 1000 sv. fr. ĉiujare.

IX. **Membroj.** En 1905 estis unue elektitaj pli ol cent membroj de L. K., kaj en 1908 12 Akademianoj, nome: Boirac, Bein, Cart, Grabowski, Moch, Saussure, Nylén, Mybs, Villanueva, Evstifejeff kaj Wackrill; Boi-

rac estis elektita prezidanto. Post lia morto en 1917, Cart fariĝis prez. Warden anstataŭis lin en 1931, kaj post Warden Rollet de l' Isle fariĝis prez. en 1933.

Nun la Akademianoj estas: Isbrücker, Aymonier, Lippmann, Rollet de l' Isle, Migliorini, Nylén, Belmont, Bastien, Stamatiadis, Bennemann, Baghy, Inglada, Cseh, Setälä, W. Bailey, Corret.

En la L. K. estas reprezentataj la lingvoj (la sekvanta nombro estas tiu de iliaj reprezentantoj):

Angla, 11; franca, 19; germana, 16; rusa, 11; pola, 7; hispana, 5; itala, 6; armena, 1; bulgara, 1; ĉeĥa, 5; dana, 1; estona, 1; finna, 1; flandra, 2; greka, 1; hebrea, 3; holanda, 5; hungara, 5; ĥina, 1; japana, 3; kataluna, 6; ladina, 1; litova, 1; norvega, 2; persa, 1; portugala, 4; rumana, 1; sveda, 3. Eintute 124 lingvoj kaj 124 anoj. (Stato en 1934.)

X. Publikigaĵoj. De 1923 ĉiujare estas publikigita jarlibro entenanta la Regularon de la L. K. kaj de la Akademio, kaj la liston de Akademianoj kaj L. K.-anoj; tiuj lastaj estas ankaŭ grupigitaj laŭ lingvoj.

Ĝis 1914 la cirkuleroj kaj dokumentoj de la Lingvaj Institucioj estis publikigitaj en Oficiala Gazeto de la Pariza Centra Oficejo. Nur per tiu gazeto kaj per la ĉiujaraj Raportoj de la Prezidanto kaj de la Direktoroj de la Laboraj Sekcioj, la E-istaro sciigis pri la laboroj de L. K. kaj de Akademio.

En 1929 prez. Cart decidis publikigi Oficialan Bultenon, kiu entenas oficialajn dokumentojn kaj, se eble, artikolojn pri E laŭ metodo severe lingvistika. Ĝi estis sendata senpage al la L. K.-anoj, interŝanĝe al E-gazetoj, kaj al la ne-L. K.-anoj, kiuj pagos ĉiujare almenaŭ 5 sv. fr. Numeroj aperis en 1929, febr. 30, — junio 30, — aprilo kaj junio 1931.

Ĉiujare la prezidanto kaj la direktoroj de la Laboraj Sekcioj prezentas al UK raportojn pri la laboroj efektivigitaj de la antaŭa kongreso, tiuj raportoj estas publikigitaj en la dokumentaro de la UK-j.

XI. Delegacio. En historio de

L. K. devas esti menciataj gravaj okazintaĵoj, kiuj preskaŭ endanĝerigis nian movadon, kiun savis la neŝanceliga fideleco de la Akademio. (v. Delegacio). ROLLET de l' ISLE.

Lingvo Internacia. Oficiala organo de Helena EA. Fondita en 1928. Formato 24×17. Aperas ĉefe en greka lingvo. Red. d-ro A. Stamatiadis.

Lingvo Internacia. Monata gazeto en E. Post la ĉeso de »La E-isto« V. Langlet, univ. studento dum vizito ĉe VI. Gernet en Odessa (Rusujo) je la somerfino de 1895 interkonsentis kun li, ke ili solvu la urĝan problemon de E-gazeto tiel, ke nova gazeto, L. I. estos eldonata de la Klubo E-ista en Uppsala kun Gernet kiel ĉefa redaktoro kaj financa direktoro. La prova n-ro aperis en 1895, kaj de 1896 ĝi aperis kiel 16-paĝa monata organo. Komence Gernet helpata de Langlet prizorgis la redaktadon. Ĉiuj presprovajoj estis sendataj al Odessa, kio kaŭzis tempoperdojn kaj malfruigojn. De aŭtuno 1897 post kelke da malfruigoj P. Nylén, tiama vicprez. de la Uppsala Klubo prenis sur sin petite de Gernet, la redaktadon kaj prizorgis ĝin ĝis fino de 1898. Dum la komenco de 1899 L. I. ne aperis pro manko de mono. Tiam Hj. Bäckström en Lulea (Sved.) proponis sian helpon kiel eld. kaj adm., pro kio L. I. aperis dum la dua duonjaro de 1899 per po du 8-paĝaj n-roj en ĉiu monato, ankoraŭ presata en Uppsala kaj red. de Nylén. Komence de 1900 la presadon kaj dissendadon prenis sur sin la presisto Paŭlo Lengyel en Szekszárd (Hungarujo), nova vigla kaj energia E-isto. Nylén restis red. dum tiu jaro kaj dum grandparto de la sekvinta, sed en sept. tute lasis la redaktorecon, kiun heredis post kelktempa red. ofico de Lengyel P. Fruictier en Paris. En sept. 1904 L. I. kune kun Lengyel transmigris ankaŭ al Paris, kie ĝi vivis ĝis la milito, de 1907 majstre redaktata de Th. Cart. P. NYLÉN.

Pri la periodo de L. I. en Paris l. la artikolon »Francujo« (p.148.), en kiu la aŭtoro tamen tro severe juĝas pri la rolo de Th. Cart kaj de L. I. Formatoj estis 22×15, 25×20 kaj 21×13. Laŭ la »Katalogo de la

E-Gazetaro» entute 252 kajeroj sur 6574 p.

Lingvo Internac'a (historia skizo). v. Int. lingvo.

Lingvo Libro. v. Literatura Mondo.

Lingvo Stilo Formo. Studoj de Kalocsay. 1931, 144 p. Enhavo: E-a Vortfarado; La evoluo de nia poezia lingvo; Sendemandaj respondoj; La E-a rimo; E-a elparolo; Pri la E-a ritmo; Klasika ritmo en E; La mezepoka E.

Lirnebank H., nederlandano, katolika pastro. Nask. 1875, mortis 13 apr. 1927. Kunfond. kaj e. trarano de NKEL. Paroladoj, artikoloj; aŭtoro de broŝuro *Kvin jaroj de E*.

Linse Otto, germano, d-ro, sindiko de industria ligo, magistratano de Frankfurt a. M. Nask. 27 febr. 1879 en Aachen, mortis 20 apr. 1932 en F. Laboris multe por E ankaŭ en Königsberg, Vogtland, Kattowitz kaj F. Gvidis kursojn. Kunlaboris al E (UEA)

Lippmann (lipman) Walter, germano, d-ro jura, advokato kaj prokuroro. Nask. 13 okt. 1895 en Leipzig. Multspeca prop. laboro ekde 1908, instruado, paroladoj, societa laboro. LK kaj dir. de la gramatika sekcio de la Akademio. Multaj artikoloj, precipe gramatikaj kaj literaturaj en E gazetoj Tradukis literaturajojn, kunlaboris (plej ofte per kontrolado de manuskriptoj) en multaj literaturaj, gramatikaj kaj vortaraj verkoj. Trad. la Z-an verkon *Lingvaj Respondoj al G*, 1921; *La refleksiva pronomo en E*, 1927; *Raportoj de la Gramatika Sekcio de la Akademio* (ekde 1924) kutime kun disertacioj pri lingvaj problemoj.

Lisac N., poŝtofiscisto en Sarajevo (Jugosl.). En 1930 eldonis kaj red. la gazeton *Monda Kuriero*.

Lishman (lišmn) Richard, anglo, ekslernejestro. Nask. 25. nov. 1850 en Newcastle-on Tyne. Hon. prez. de Nordorienta EF. Dum kelkaj jaroj instruis E-kursojn.

Lisičnik Ida, sovetianino, hebrea. Nask. 1898 en Kiev, finis jurinstituton 1920 kaj instituton de eksterrilatoj 1924. Aktiva E-istino de 1912. Komitanino kaj poste prez. de ES en Kiev. Kunrangis la 2-an tutruslandan kongreson en Kiev 1913. Dir. de Kieva E-instituto 1918. De 1926 loĝas en

Sebastopol (Krimeo), tie iniciatis grandan laboron pri organizo de vasta kolektiva int. E-korespondado sub aŭspicioj de la loka ĵurnalo »Majak Komunyn«. Riĉan sperton de tiu laboro ŝi rakontis en ruslingva libro »K-do Mac Millan al K-do Satov«, 1933.

Litauer Józef, polo, advokato. Nask. 7 jan. 1894 en Lodz. Kunlaboranto de ĉiutaga organo de la pola socialista partio. Kunfond. de ER »Konkordo« en Varsovio. Gen. sekr. kaj prezidanto de LEA »Laboro« en P-ujo. Gen. sekr. (ĝis 1931) de Int. S. de E-Juristoj. Dum la milito sekr. de E-ista Amikaro en Lyon (Francujo).

Literatura Mondo. Neŭtrala literatur-arta revuo aperanta en Budapeŝt. Ĝia fondinto estis d-ro T. Schwartz, kiu eldonis la revuon kaj estis ĝia resp. red. de okt. 1922 ĝis sept. 1924 Poste la eldonon transprenis Hungara E-Instituto, resp. ĝia gvidanto d-ro V. Tóth. La revuo ĉesis aperi en apr. 1926. Ĝiaj redaktoroj estis en tiu ĉi unua periodo d-ro K. Kalocsay kaj J. Baghy. La revuo refondis en jan. 1931 V. Bleier, kiu fariĝis la eldonisto kaj administranto de L. M. Ĉefred. estis denove K. Kalocsay kaj J. Baghy, respondeca red. K. Bodó kaj red. d-ro F. Szilágyi kaj L. Totsche. Baghy ekŝiĝis en jan 1933 pro personaj kaj principaj motivoj. L.M. havas la plej internacian kunlaborantaron, eĉ de ekstrema oriento. Plej ŝatataj estas ĝiaj observoj kaj objektivaj detalaj kritikoj kaj la naciaj numeroj, el kiuj aperis ĝis nun la estona, pola, ĉeĥa, jugoslava, latva, sveda. L.M. estas ankaŭ la debutejo de la nova poetgeneracio. La formato estis ĉiam la sama: 30x23. En la unua periodo aperis entute 838 p., en la dua 830 p. (sen la aldonajoj). En 1933 la recenza kaj lingva enhavo aperis en la aldonajo: »Bibliografia Gazeto« (72 p.), de jan. 1934 tiu ĉi kvaronjarajo havas la titolon: »Lingvo Libro«. L. M. aperis ĉiam en arta eksterajo kun multaj ilustraĵoj. Entute: la revuo havas ne facile takseblan signifon en la historio de la E-a literaturo.

En la dua periodo L. M. estas ankaŭ la plej aktiva E-eldonejo. La celo de la eldonejo estas helpi la

eldonon de la unuaj verkoj de novaj verkistoj kaj tiurimede kreskigi la originalan literaturon samtempe donante signifan kvanton da tradukita literaturo. Dum la kvar jaroj de ĝia ekzistado ĝi aperigis 43 diversgrandajn verkojn kun paĝonombro 7600 kaj vendoprezo de 185 svfr. En 1933 ĝi fondis la Asocion de Esperantistaj Libro-Amikoj. Inter la verkoj eldonitaj de LM ni trovas ĉiujn verkojn de Kalocsay, la originalajn verkojn de Engholm, la unuajn originalajn verkojn en libroformo de Totsche, Weinhengst, Aisberg, Adamson, la unuan arthistorion en nia lingvo, ĉi tiun Enciklopedion. La programo por 1935 antaŭvidas 15 verkojn en proks. 5000 paĝoj. La eldonaĵoj de la firmo elstaras ankaŭ pro ilia plaĉa ekstero kaj nepre altnivela enhavo, senriproĉa stilo. Laŭ aserto de kelkaj kritikistoj la eldonejoertas la neologismajn verkistojn. Tiam aserton senbazigas la fakto, ke krom en la verkoj de Baghy, Kalocsay kaj Totsche inter la aliaj verkistoj oni apenaŭ povas trovi iujn, kiuj uzas neologismojn. La eldonejon gvidas de la fondo V. Bleier kaj de tiu tempo laboras por ĝi la Pestvidéki Nyomda Vác. (Presejo apud Budapeŝt en Vác.) Pri la aktiveco kaj laboro de la entrepreno bone informas nin ĝia katalogo senpaga, eldonita en 1934. Ĝi estas la plej bela kaj plej impona el ĉiuj tiuspecaj presajaĵoj.

Literaturo. Tutmonda Gazeto E-a, London. Ĝi ne nur enhavis modelan literaturon (ĉefe anglan kaj el ĝi precipe verkojn de Ŝekspir), sed ankaŭ tre bonan lingvan fakon kaj lit. fakon kun recenzoj de novaj verkoj. Red. estis anoj de la »Brita Literatura kaj Debata Societo«, precipe B. Long kaj F. R. Shelton. — Vol. 1: jan.—marto 1919 okt.—dec. 1920, 8 kajeroj 8×IV+192 p. Vol. 2: jan.—marto 1921 okt.—dec. 1922, 8 kajeroj 8×IV entute 224 p. Vol. 3: jan.—marto 1923 okt.—nov. 1924, 8 kajeroj 8×IV+192 p. Vol. 4: jan.—marto okt.—dec. 1925, 4 kajeroj 4×IV+96 p. 18×12. — En okt. 1930 aperis la 1-a n-ro de alia L. en Malmö, IV+18 p. 25×17. Sed post interkonsento kun LM ĝi tuj ĉesis aperi. P. TARNOW.

Literaturo. (Tradukaĵoj.) La unuaj provoj traduki literaturarojn en E-n havis plej ofte la karakteron de lernejekzerco; la verkintoj sendis siajn manuskriptojn al Z (tiam ĉefredaktoro de La E-isto) kiu, antaŭ ol aperigi ilin en la gazeto, korektis erarojn stilajn kaj gramatikajn. Multaj el la regulaj kontribuantoj al la gazeto dum tiu periodo (1889—95) iĝis ĝenerale konataj pro sia tradukagado; inter ili troviĝis Grabowski, de Wahl, Devjatin, Kofman kaj L. E. Meier.

Ĝis 1904 aperis libroforme nur malmultaj tradukoj, ĉar la E-scianta publiko estis tro malgranda. Plej interesaj el la ĝis tiam aperintaj verkoj estas: La Gefratoj (Goethe) kaj La Neĝa Blovado (Puŝkin) de Grabowski; Hamleto (Shakespeare) de Z, Demono (Lermontov) kaj Boris Godunov (Puŝkin) de Devjatin; Iliado (Homer) kaj Kain (Byron) de Kofman; Princino Mary (Lermontov) de Wahl. En tiu tempo oni plej ofte tradukis el lingvoj rusa, pola kaj germana: afero klarigebla per tio, ke tiuj estis la gepatraj lingvoj de la plimultaj E-istoj.

Kun la plivastiĝado de la E-movado kaj la sekva plioftiĝo de int. renkontiĝoj, plivastiĝis kaj plioftiĝis ankaŭ la tradukoj el la naciaj literaturoj. Sur la titolpaĝoj aperis novaj nomoj: Pujlada, Inglada, Bicknell, Kotzin, Cederblad, Lengyel, Hodler, Meyer, Noël, Motteau, Roksano, Vallienne. Plimultiĝis klasikaj verkoj el la okcidenteŭropaj literaturoj; reprezentigis Shakespeare per La Ventego (trad. Motteau), Julio Cezaro (Lambert), Makbeto (Lambert); Macaulay — Horacio (Bicknell); Tenyson — Gvinevero (Bicknell); Molière — L'Avarulo (Meyer), Edziĝo Kontraŭvola (Dufettrel), Don Juan (Boirac), Georgo Dandin (Z); Conscience Blinda Rozo (van Melckebeke kaj van Hove), Rikke-Tikke-Tak (Maria Posenauer), Kion patrino povas suferi (Schoofs); Racine — Athalie kaj Esther (Noël), Prévoŝt — Manon Lescaut (Vallienne); Goethe — Ifigenio en Taŭrido (Z); Schiller — La Rabisto (Z), Wilhelm Tell (L. E.

Meier); Grimm — Elektitaj Fabeloj (Kabe). Krome aperis pluraj verketoj (verketoj) de Musset, Maupassant, Balzac, Vigny, kaj aliaj tiaj mondkonataj verkistoj.

La alfluo de ĉi tiu flanko neniel ĉesis; la orienteŭropan agadon; tie aktivis: Z mem (La Revizoro de Gogol, Marta de Orzeszko), Grabowski (verkoj de Slowacki, kaj Sienkiewicz), Kabe (Pola Antologio kaj verkoj de Sierozewski, Orzeszko, Prus, Reymont, Turgenev), kaj Devjatnin (verkoj de Puŝkin, Gogol, Krilov). Ankorau maloftis verkoj el la literaturoj hispana, hungara, itala, sveda, dana kaj japana; aliflanke ne mankis tradukoj el la klasikaj lingvoj — latina, greka, hebrea. El la lasta Z tradukis jam antaŭ la mondmilito la pliparton de la Malnova Testamento.

Malgraŭ la plivastiĝo de la E-istaro, ankorau persistis en iuj rondoj la ĝenerale malprobinda kutimo traduki el lingvoj fremdaj al la tradukantoj. En la fruaj tagoj tiu kutimo estis almenaŭ tolerinda, ĉar kondiĉita de la eksteraj cirkonstancoj, sed oni rajtas bedaŭri, ke ankaŭ post aliĝo de la cirkonstancoj, kelkaj personoj ne limigis sian laboron al tiu kampo, sur kiu ili estis nedubleble plej fidindaj. El la malmultaj kiuj sukcese kontraŭigis tiun principon, Grabowski elstaras pro sia poemaro EIParnaso de l'Popoloj, kiu enhavas krom poemoj originalaj ankaŭ tradukojn el tridek lingvoj.

Antaŭ la eksplodo de la mondmilito aperis la jenaj verkoj diverskiale interesaj: Fabeloj (Wiseman-Ramo), La Venecia Komercisto (Shakespeare — Wackrill), Bulgaraj Rakontoj (Vazov — Atanasov), Eugenio Grandet (Balzac — Gasse), Elektitaj Poemoj (Heine — Pillath), Hispanaj Dramoj kaj Angora Katino (Benavente — Inglada), Japanaj Rakontoj (Chif Toshio), Hebraj Rakontoj (Salom-Alehem kaj Perc-Muĉnik), Kroataj Poeziaĵoj (M. Spicer), Fantomoj (Turgenev — Fiŝer) Novaj Versaĵoj (Lermontov — Bela Manto), kaj tri tradukoj de ŝidlovskaja: Princo Ser-

ebrjanij (A. Tolstoj), Stranga Historio (Turgenev) kaj Arbaro Bruas (Korolenko).

Dum la milita periodo la agado sur la literatura kampo preskaŭ tute ĉesis; kaj post 1918 ĝi revigliĝis nur malrapide. Rekomencis labori kelkaj el la pioniroj, sed pliparte novaj elementoj koniĝis al la E-istaj legantoj. El la antaŭmilitaj tradukistoj plej gravis Grabowski; pro sia majstra traduko de la fama pola epopeo Sinjoro Tadeo de Mickiewicz; jam de jaroj Grabowski revis traduki tiun verkon tiel karan al la pola popolo, sed la grandeco de la tasko longe fortendis lin de la provo. Efektivigante fine sian malnovan revon, li devis multe eksperimenti pri la lingvo; preskaŭ neatentate li iris tiun vojon, kiun post lia morto la hungara poeto Kalocsay sekvis tiom atentveke. Aliaj jam konataj figuroj, kiuj reaperis, estis L. E. Meier (Fabeloj-Lessing), ŝidlovskaja (Senlingvulo kaj La Sono de Makaro de Korolenko: La Kapitanfilino de Puŝkin), kaj Fiŝer (Tri Rakontoj de Puŝkin).

Baldaŭ evidentiĝis, ke la novuloj estas tute kompetentaj repreni la plumojn de tiuj, kiuj ne plu laboras ĉe la tradukado. Sur la unua rango staras: Hilda Dresen — estoniano; Bulthuis — nederlandano; Morariu — rumano; Kalocsay kaj Bodó — hungaroj. Hilda Dresen koniĝis al int. legantaro poemarojn de Marie Under (Elektitaj Versaĵoj) kaj de Barbarus (Horizontoj); kaj ŝi kunredaktis la unuan volumon de la Estona Antologio. Skribante pri estona literaturo en E, oni devas ne forgesi la novelaron Kvin Noveloj (Tuglas) bonege tradukitan de Sep-pik. Ankorau malgrandas la rumana kontribuo al nia literaturo; sed tio kion ni jam havas en la tradukoj de Morariu (Niĉjo Mensogulo — Bratescu-Voinesti kaj Nobela Peko — Sadoveanu) sopirigas al pliampleksigo de tiu fako.

Kvankam Bulthuis jam antaŭmilitale faris tradukojn (Salome de Oscar Wilde, kaj plurajn francajn verkojn en kunlaboro kun Toucheboeuf), li tamen apartenas pli ĝuste al la postmilita

periodo. Pri la tradukkapablo atestas precipe La Malgranda Johano, alegoria historio de van Eeden, laŭdire unu el la plej popularaj verkoj en la nederlanda literaturo, La Leono de Flandrujo, el la flandra de Conscience, Imperiestro kaj Galileano el la norvega de Ibsen, kaj Taglibro de Vilagpedelo el la dana de Blicher.

El la hungara, Kalocsay tradukis la dramon: La Tragedio de P Homo (Madách), la popolfabelon Johano la Brava (Petöfi) kaj Morgaŭ Matene (Karinthy); Karlo Bodó atingis egale altan nivelon per siaj tradukoj de la novelaro Norda Vento (Karinthy) kaj la romano La Cikoni-Kalifo (Babits). Se iu jam leginta la cititajn verkojn ankoraŭ ne konvinkigis pri la alta rango de la hungara literaturo, kroman ateston oni povas prezenti per la poem- kaj prozokolekto Hungara Antologio, kompilita de Kalocsay kunlabore kun Bodó, Szilágyi, Totsche, Halka kaj Baghy.

Jam supre ni atentigis pri simileco inter la laboroj de Grabowski kaj Kalocsay en la sfero de lingvo-eksperimentoj; plia simileco troveblas en tio, ke ankaŭ Kalocsay aperigis kolekton de poemtradukoj el multaj lingvoj: la verko Eterna Bukedo enhavas ĉefverkojn poeziajn el dudek lingvoj, prezentitajn en tiu brila maniero, kiun oni atendas de la plej sukcesa vivanta E-poeto. Kaj lia traduko de la Infero de Dante estas plej nova, kaj plej granda triumfo de la poezia lingvo E-a.

Nur post la morto de Z aperis ties traduko de la Fabeloj de Andersen, en tri volumoj (1923, 1926, 1931), R. U. R. (Karl Capek) kaj Tridek Jarojn en la Ora Nordo (Jan Welzl), modernaj verkoj el la ĉeĥa, aperis en E dank' al la tradukistoj de Moraviaj E-Pioniroj. El Bulgario venis la interesaj novelaroj: Nuntempej Rakontoj (Stamatov-Krestanoff) kaj Novaj Bulgaraj Rakontoj (Vazov-Atanasov); Krestanoff preparis ankaŭ la Bulgaran Antologion aperintan en 1925. La katalunan literaturon vaste konigis la Kataluna Antologio en la redak-

to de Jaime Grau Casas, la belgan literaturon la Belga Antologio (Flandra kaj Franca Partoj), la litovana: Litova Aimanako.

Forlasante dum iom da tempo la eŭropan kampon, ni esploru la laboron sur aliaj kontinentoj. En malproksima oriento ni trafas plurajn mezepokajn teatraĵojn kaj modernajn kriminalromanojn el la japana lingvo; sur pli alta nivelo staras la aŭtobiografiaj verkoj de Ariŝima: Deklaracio kaj Senbendaŭre Amo Rabasen tradukoj de T. Tooguu. Ĝis nun Ĉinujo preskaŭ nenion kontribuis al la E-a literaturo; escepto estas la moderna dramo Ribelemaj Virinoj de M. Ĉ. Kuo, tradukita de S. M. Chun.

Post vojaĝo mensa trans la Pacifikan Oceanon kaj Amerikon, ni atingas la laborejon de la usonano Payson, kiu dum la lastaj jaroj de sia vivo tre fervore tradukis el angla lingvo: La Rozujo Ĉiumiljara kaj Palaco de Dangero de Wagnalls, Mimi de Giesy, Luno de Israel de Rider Haggard (kunlabore kun Butler) kaj plurajn aliajn verkojn.

Lasta rigardo jetita sur la eŭropan laborokampon videbligas faskon da tradukoj el dek unu lingvoj; el la angla venis La Dormanto Vekigis (H. G. Wells — Millward), Jane Eyre (Charlotte Bronte — Bulthuis); el la flandra — Pallieter (Timmermans — Jan van Schoor), Servokapabla — Marcustybout (Eekhoud — Bergiers); el la franca — Kandid (Voltaire — Lanti), La Mizantropo (Molière — Boucon) Bareluloj kaj Fadenuloj (Maurois — Berna Fabo); el germana — En Okcidento Nenio Nova (Remarque — Kvar), La Vojo Returne (Remarque — Berger), La Hirundlibro (Ernst Toller — H. Wolff), La Okuloj de la Eterna Frato (Stefan Zweig — H. Wolff), Romaj Elegioj kaj La Taglibro (Goethe — Kalocsay); el la holanda — Akbar (Limburg-Brouger — Isbrücker kaj Ziermans), Gysbreght van Aemstel (van den Vondel — Isbrücker); el la itala — Historio de Kristo (Papini — Anonima), Infero (Dante — Kalo-

csay), Pinokjo (Collodi — Marchesi); el la kroata — La Morto de Šmail-Aga Ĉengjiĉ (Mazuraniĉ — M. Spicer); el la juda — La Sorĉistino el Kastilio (Salom-Asch — Lejzerowicz); el la hebrea — Merkado la Azenpelisto (Naum Jeruŝalmi — Leono Vienenano); el la rusa — Ruĝa Stelo (Bogdanov) kaj Per Voĉo Plena (Majakovskij), poemaroj tradukitaj de Rublov, Hohlov, Nekrasov, k. a., Eŭgeno Onegin (Puŝkin Nekrasov); el laŭveda — Per Balono al la Poluso (André, Strindberg, Fraenkel — Engholm), Tra Sovagha Kamĉatko (Bergman — Gerdman). La Mono de Sinjoro Arne (Selma Lagerlöf — Engholm.)

(Originalaj verkoj.) Estas memkompreneble, ke dum la fruaj jaroj la verkistoj ne tiom aktivis sur la kampo de originala literaturo kiom sur tiu de la tradukita; por tiaj tradukoj, kiaj eliris tiuepoke, oni ne ĉiam konsideris necesa la verkistan talenton: bezonata estis nur iagrada posedo de la lingvo kaj iom da libera tempo.

La unuaj provoj de originala verkado estis tiuj de Z mem, kiu en sia Unua Libro (1887) publikigis siajn poemojn Mia Penso kaj Homia kor'! el kiuj la unua estas gemo de nia poezio. En la fruaj numeroj de La E-isto presigis originalaĵoj de L. E. Meier, Grohn, Fez (Felix Zamenhof), kaj Goldberg. En 1896 aperis la unua aparte presita poemo: Nevola Mortiginto de Devjatnin. En la serio Biblioteko de la LI sekvis la prozaj verkoj Kraljeviĉ Marko (M. Abesgus), El la Vivo de la E-istoj (V. Stankeviĉ), En la Brikejo (J. Wasniewski), kaj Du Mirrakontoj (O. Zeidlitz). La Fundamenta Krestomatio, unue eldonita en 1903, enhavis krom originalaj poemoj de Z, ankaŭ verkojn de aliaj E-istoj; la materialo grandaparte jam aperis dise en la kajoroj de La E-isto kaj ĝia anstataŭinto Lingvo Int.

La Kongreso en Bulonjo (1905) antaŭis grandan progreson en la literaturo originala; aperis Du Rakontoj

(Rothau), Urso — En Montoj (Sentis); Sep Rakontoj (Ivan Malfeliĉulo), kaj la poemaroj Versajareto (Dombrowski), Verdaĵ Fajreroj (Frenkel). Al franca kuracisto, d-ro Vallienne, ni ŝuldas la unuan originalan E-an romanon, Kastelo de Prelongo (1907); ĝi temas pri la rilatoj inter la membroj de franca nobela familio kaj ĝiaj servistoj. En la sekvanta jaro Vallienne, kiu devis forlasi sian profesion karieron pro malbona sanstato, aperigis duan romanon Ĉu Li? Ambaŭ verkoj estas tre interesaj; ilian lingvan neperfektecon oni devas ne tro atenti, ĉar memorendas, ke Vallienne estis pionira verkisto en periodo, kiam la ĝenerala lingva nivelo estis ankoraŭ malalta.

Al la kresko de la antaŭmilita poezio kontribuis precipe poloj Elski kaj Elska (Unuaj Agordoj — 1910), ĉeĥo Stanislav Schulhof (Per Espero al Despero, Kion la Vivo Alportis — 1911; Aŭtunaj Floroj — 1912), sviso Edmond Privat (Tra P Silento — 1912), polo Juliusz Kriss (Melodioj de l' Nokto — 1914) kaj Charles Bicknell, anglo loĝinta longe en Italujo, kiu kontribuadis poemojn al pluraj gazetoj. Tiuj ĉi poetoj ofte montris sin alte inspiritaj, sed la teknika manko de iliaj verkoj kelkfoje iom deprenas de ilia poezia efiko.

Marie Hankel kaj Rokasano (Jane Flourens), du el la malmultaj E-istaj verkistinoj, aperigis respektive Sableroj (1911) kaj La Senlaca Sinofero (1912); ĉi tiuj verkoj tamen havas intereson sole historian. Post la romanoj de Vallienne sekvis du verkoj de H. A. Luyken: Paŭlo Debenham kaj Mirinda Amo; ili atestas pri verkisto kompetenta, sed tro ema krude propagandi en siaj literaturaj kreaĵoj tiajn ideojn, kiaj malplaĉas al nekristanaj legantoj. Tute malsimilan humoron naskas la sprita rakonto de John Merchant — Tri Angloj Alilande — kiu, pretendante nenian literaturan valoron, konvene prezentis al la mondo la kernon de angla humuro. Tria anglo, Richard Sharpe, aperigis en 1913 autobiografian verkon Travivaĵoj de Ro So.

Dum la mondmilito preskaŭ ĉesis la verkado en E; solaj atentindaj verkoj de tiu periodo estis la poemaro *La Dorna Karesilo* de Bela Manto (Boris Mirski) kaj, pli grave, la filozofia romano *Nova Sento* de Tagulo (H. Hyams). En ĉi lasta verko utopia, la aŭtoro eksponis sian vivfilozofion, konsistantan el ideoj socialismaj, teozofiaj, vegetaranaj.

Baldaŭ post la militfino denove laboris la originalaj verkistoj; kaj al iliaj vicoj aliĝis ankoraŭ novaj figuroj. En Moskvo ekpoetis ruso Mihalski sub la standardo de la klasbatalantaj E-istoj en *La Nova Epoko* kaj daŭrigis en la verko *Prologo*. En Budapeŝto du hungaroj, Kalocsay kaj Baghy, ekpaŝis sur vojo, kiu kondukis al ŝatinda plivalorigo de la poezio E-a.

En 1921 aperis la unua poemaro de Kalocsay: *Mondo kaj Koro*; jam en tiu verketo evidentis, ke sur la kampon venis poeto, kiu pli ol liaj antaŭuloj zorgos pri la tekniko poezia; tamen oni sentas kelkfoje deziron, ke li ne estus repolurinta du-tri el la gemoj de tiu unua kolekto por ilin konformigi al siaj plej lastaj teorioj. Dum dek jaroj aperadis en diversaj gazetoj multaj poemoj de Kalocsay; en 1931 eldoniĝis la plena kolekto *Streĉita Kordo*. Kio ajn venos estonte por pliriĉigi nian poemtrezoron, ne estas antaŭvideble ke *Streĉita Kordo* per tio perdos sian rajtan lokon ĉe la kapo. En ĝi oni trovas poemojn kantantajn la E-ismon, la seniluziigon de la maturiĝo, la amon, la naturon, la malfeliĉon; vere rimarkinda estas la alta nivelo de tiom ampleksa verko.

Preter la Vivo (1923) kaj *Pilgrimo* (1926) konigis al la E-istaro Julion Baghy, la amatan vagabondon, la poeton de la E-ista popolo, la »kavaliron de P' tutmonda paco«. Konfesendas, ke ne ĉiam li atingas same altan gradon; kaj oni trovas en liaj poemoj pli romantikan esprimon de la emocioj ol en tiuj de lia samurbano. Liajn verkojn distingas lia profunda kompatado kaj kunsento por ĉiuj viktimoj de la premanta vivo. Liaj profunda sentemon, lian melankolion, lian romantikon, ĉion ĉi oni po-

vas atribui al lia heredo kaj al la medioj en kiuj li vivis; precipe lia profesio — la dramaktora — kaj lia militista vivo lasis nepre rekoneblajn impresojn sur liaj poemoj kaj prozaj verkoj. Lia unua romano *Viktimoj* estas bazita sur liaj spertoj en Siberio dum la mondmilito; ĉi tiu verko iĝis eksterordinare populara ĉe la E-istoj, por kiuj ĝi okupas rolon iom similan, al la rolo de la verkoj de Charles Dickens ĉe la angla popolo. En kelkaj el la noveloj de Baghy montriĝas satirtendenco kiu iugrade kompensas la troan sentimentalecon de aliaj verkoj. Tiu maliceta flanko de lia karaktero naskis ankaŭ la longan romanon *Hura!* (1931) kiun la aŭtoro mem nomis grimaco; kaj en la sama jaro aperis *Printempo en la Aŭtuno*, verko prezentanta en alta grado lian romantikon.

Aliaj debutantaj poetoj de la postmilitaj jaroj estis: Mangada-Rosenörn (*Versajaro* — 1922), Jaime Grau Casas (*Amaj Poemoj* — 1924), Novaj Amaj Poemoj — 1927), Olsvanger (*Eterna Sapiro* — 1925), Teo Jung (*La Alta Kanto de la Amo* — 1927), Jan van Schor (*Amo kaj Poezio* — 1928), Hohlov (*La Tajdo* — 1928). El ĉi tiuj verkoj elstaras tiu de Hohlov, poste forlasinta la originalan lirikon por helpi al la progresigo de la revolucia literaturo; *La Tajdo* rajtas lokon sur la sama breto kun *Streĉita Kordo* kaj *Preter la Vivo*. La poezion de Hohlov oni povas plej trafe nomi rava; oni sentas ke la poeto same estras materialon kaj esprimeknikon.

En la epoko de postmilita reorientiĝo ankaŭ la proza literaturo akiris novajn trezorojn. Luyken, verkinta jam antaŭmilite, nun laboris sur pli alta nivelo, por produkti la romanojn *Stranga Heredajo* kaj *Pro Iŝtar*. El la plumo de la senlaca nederlandano Bulthuis fluis la trankviletosaj verkoj *Idoj de Orfeo*, *Jozef kaj la Edzino de Potifar*, kaj *La Vila Mano*. Jean Forge, pola filmscenariisto, aperigis *Abismoj* kaj *Saltego trans Jarmiloj*, pliriĉigante tiamaniere la distran literaturon laŭ la ekzemplo

establita en 1920 de Argus (F. Ellersiek) per la kriminalromano *Pro Kio?* Post senfrukta periodo de ok jaroj Forge eldonis trian verkon *Mister Tot Aĉetas Mil Okulojn*.

La poemaro *Verdkata Testamento* (1926), de R. Schwartz, por la unua fojo kontentige reprezentis en la literaturo de E tiun tipe francan spritecon, kiu baziĝas sur la epikura filozofio kaj la trankvilanima akcepto de la homoj tiaj, kiaj ili estas. La fakto, ke la verkoj de Schwartz ofendas multajn personojn, kiuj ne partoprenas tiun filozofion neniom povas depreni de la majstreco de la verkisto en tiu fako, kiun li elektis sia. Lia genio ne limiĝas al la elekto de temoj kaj situacioj, sed trovas respeguliĝon ankaŭ en la brila maniero, laŭ kiu Schwartz servigas al si lingvan ilon tute ne intencitan funkcii kiel komunikilo por spritaj sentencoj kaj verdiktoj, por vortludoj kaj malicaj parodioj. Trafinte per sia unua verko sukcesan vejnon, li eldonis en 1928 samhumoran novelaron *Prozo Ridetanta* kaj en 1932 sian duan poemaron *La Stranga Butiko*, »honore al la granda krizo«. En ĉiuj tri verkoj Schwartz dediĉis grandan parton por priiridi la E-istojn kaj iliajn instituciojn; oni ne povas dubi, ke tio estas por la mensa saneco de la popolo bona afero, precipe se oni partoprenas la opinion de G. K. Chesterton, ke »kelkaj aferoj en la vivo estas tiel gravaj, ke oni ne rilatu serioze al ili«. Rimarkinda trajto ĉe Schwartz estas lia kapablo krei per kelkaj plumstrektoj tute kompletan kaj concepteban bildon pri sceno al li familiara; tiu trajto videblas altgrade en lia romano *Anni kaj Montmartre*.

En 1930 aperis sur la horizonto du novaj kaj atentindaj figuroj: Stellan Engholm kaj Kenelm Robinson. La unua, svedo, eternigis sur la paĝoj de sia novelo *Al Toronto* la idilian amaferon de juna sveda lignohakisto kun knabino de najbara vilaĝo. Flanke de la centra temo de la rakonto, Engholm lerte kaj konvinke tuŝas tiujn gravajn aferojn, kiuj de tempo al tempo frontas la maturiĝantan junulon. En *Homoj sur la Tero*, la sama verkisto pentras similan

bildon pli grandskale, sed ne pli sukcese.

Se Grenereto... de Kenelm Robinson, kelkajn jarojn pseidonimo de anglo, antaŭe eldoninta nur kelkajn novelojn en la gazetoj, vekis intereson samjare en multaj literaturaj rondoj, ĉar ĝi alportis ion novan al la internacia kulturo konstruata de la E-istaj verkistoj. Dediĉita »al la majstro, André Gide«, ĝi enhavas dekon da noveloj kaj eseoj kun pli longa novelo *La Fremda Knabo*, en kiu la aŭtoro prezentas kun akuta observado la vivon de knaboj en angla pensionlernejo. Robinson verkis ankaŭ *Vol. II. Dulingva kolekto de noveloj kaj poemoj*, kaj la drameton *Homarisma Laboro*, morda atako kontraŭ la moralo de la brita burĝa klaso. Pri lia valoro estis granda diskuto en nia literaturo, ĉar liaj verkoj vekis fortan indignon ĉe iuj.

Litova Almanako. 1923, 284 p. Poeziaj kaj noveloj el la litova literaturo; artikoloj pri la historio, nacia civilizacio, arto, lernejoj, ktp. de la lando.

Litovujo. Ĉar la rusa cara registaro, sub kies jugo estis la lando ĝis 1918, malpermesis presadi librojn kaj aliajn presajojn en litova lingvo (ĝis 1905), do ankaŭ ia ajn kultura agado litova ne povis prosperi dum longa tempo. Ĝis 1905 la litovaj presajoj estis preparataj en Germanujo kaj kontrabandoje portataj en la landon. Ankaŭ la unua lernolibro de E por litovoj estis eldonata en Germanujo en Tilsit, verkita de A. Dambrauskas (Dombrowski) en 1899, kiu lernis la lingvon jam en 1887. Sed ankaŭ tiu ĉi verketo ne povis esti disvastigata. La unua E-grupo fondiĝis en 1892 en Vilno, (tiu ĉefurbo nun apartenas al Polujo). Pioniran laboron plenumis krom Dambrauskas A. Nedošivin, P. Medem, A. Klimas, A. Opulskis, J. Maĉernis, E. Janickiene. En 1910 tondiĝis en Kaunas, la nuna ĉefurbo de la lando, vigla E-societo, kies gvidanto estis A. Nedošivin, altranga rusa oficisto; la societo havis fine de tiu jaro 134 anojn. Dum la milito la tuta havaĝo de la societo pereis. Printempan tagon

de 1919 reveninta pioniro Mačernis rimarkis, ke estas vendataj E-libroj kiel envolvpapero. Post demandado li trovis sub loĝejtegmento la mizerajn restaĵojn de iam riĉa biblioteko. Iom post iom ia grupo en Kaunas ekvivadis, 10 dec. 1919 fondiĝis tutlanda organizajo Litova E-Asocio, kun la partopreno de A. Dambrauskas, J. Mačernis, A. Opulskis, T. Kocin, A. Timiuskis, ktp. LEA progresis ankaŭ en provincaj lokoj, havis sekciojn en 17 urboj. La plej grava grupo funkcias en Kaunas, kie gvidis kursojn P. Medem, B. Giedra, V. Butkus, Paškevičius, Kutra, Balčiūnas; la biblioteko de la grupo enhavas ĉ. 600 librojn. En 1922 aperis la gazeto Litova Stelo, subvenciata de la registaro ĝis 1926, kun eldonkvanto de 1500 e-roj (el kiuj nur 208 por litovoj en 1926). Post la ĉeso de la subvencio la gazeto baldaŭ ĉesis aperi. Poste aperis Litova E-Revuo, sed ankaŭ ĝi ne havis longan vivon. Laŭ la statistikoj de Dietherle en 1928 en la lando troviĝis 18 E-grupoj kaj E-istoj en 76 lokoj. La litova radio-stacio unu aŭ dufoje en semajno dissendas E-lingvajn parolajojn. Aŭtoroj de lernolibroj: Dambrauskas, Tjunaitis, Klimas. Plej grava verko eldonita de litovaj E-istoj estas Litova Almanako, presita per registara subvencio.

(Kunmetita laŭ informoj de Butkus, Klimas, Mačernis kaj Ŝirjaev.)

Ljubin Marin, bulgaro, oficisto. Nask. 1903. Aktiva funkciano de Bulgara LEA, red. de ties eldonaĵoj. Aŭtoro de originalaj E-poemaro Ruĝa Aŭroro (du eldonoj 1930 kaj 1932) kaj novelaro La himno (1931). Membro de IAREV.

LK: Lingva Komitato. (v.)

LKK: Loka Kongresa Komitato. v. Kongreso.

Llinás Bellvehi (ljinás beljvehi) Antonio, hispano, ĝis 1921 komercisto, nun ŝtata oficisto. Nask. 13 sept. 1893 en Santa Colona de Farnés. E-isto de 1911, starigis grupojn, verkis artikolojn. Aktiva SAT-ano.

Lloyd (lojd) Richard John, M. A., D. Litt., anglo, lektoro pri fonetiko ĉe Universitato de Liverpool, 1898—1906. Bopatro de la romanisto Silas

Hocking. Dronis en Rhone 29 aŭg. 1906, vizitante la UK en Genève. Verkis la bonegan libreton »The Language, practically considered and described«, kaj artikolojn pri E-gramatiko.

LM: Literatura Mondo. v.

Lobo Acacio, portugalo, majoro infanteria. Parolis sep lingvojn. Estis E-cenzuristo dum la milito. Verkis: E tiel kiel oni ĝin parolas, kaj gramatikon.

Lola Jimenez (lojra ĥimenez) Aŭgusto, hispano, fregata kapitano. Mortis. Fond. La Suno Hispana, 1903. Trad. la faman verkon de Fray Luis de Leon La Perfekta Edzino kaj aliajn amuzajojn.

LOK: Loka Organiza Komitato.

Lombard (lonbar) Emile, franco, d-ro fil., licea prof. en Paris, mortis 28 apr. 1903. E-ĝis jam en 1895. Li estis dir. de la revuo »L' Etranger«, (titolita »Concordia« en 1899), kies celo estis disvastigo de fremdaj lingvoj; li enkondukis E-n en sian revuon samnivele kun la angla kaj la germana lingvoj. Tio estis la unua revuo favora por E; ĝi publikigis preskaŭ ĉiumonate artikolojn pri E, kaj altiris al nia movado kelkajn niajn pionirojn (f-ino Zabilon D'Her, f-ino Roux, ktp.).

Lombos (lomboŝ) Alfréd, hungaro, antaŭe luterano, nun kalvinana pastro en Bonyhád, ĉ. 50 jara. Aktiva E-isto ĉefe en la antaŭmilitaj jaroj. Verkis prop. broŝuron kaj E-H vortartablon, ambaŭ en 1910, kompilis E-ludkartaron en 1920, por servi al E kaj la pacifismo.

London. Ĉefurbo de Britujo; kun 4,700.000 loĝ. (Granda-L. 8,203.000 loĝantoj.) Grava biblioteko kaj arkivo de E: 36 Penrhyn Rd. Kingston Parolado de Z en 1907 en Guildhall (Urbodomo). — 10-a kongreso de SAT 3—7 aŭg. 1930; ĉ. 340 partoprenantoj el 16 landoj. SEU bojkotas la kongreson per intenca neĉeesto de sovetoj. Diskuta batalo inter komunistaj partianoj unuflanke kaj la SAT-gvidantoj kun ĝiaj aprobantoj aliflanke. — Postkongreso 9—11 aŭg. 1930 kun plimulto de la partoprenantoj de la UK en Oxford.

Long Bernard, anglo, ŝtaticisto. Nask. 14 majo 1879 en Oakhill. Labo-

ras en oficiala teknikejo en London. Lernis E-n pro jurnalaj raportoj pri la UK en Boulogne, 1905. De 1911 konsilantaro de BEA. Prez. de la UK en Oxford, 1930. Verkis multajn artikolojn kaj broŝurojn pri E; inter ili *The Passing of Babel*, (1912), kaj *E, its Aims and Claims* (1930); ankaŭ artikolojn por diversaj E-gazetoj. Ĉefred. de kvaronjara E gazeto *Literaturo* 1919—24, kunverkinto de la ĉefa A-E vortaro, Fulcher and Long.

Lonkopolanski Edvardo, ps. de Edvard Wiesefeld (v.).

Loránd Leo, hungaro, d-ro, kuracisto. Antaŭmilite ĉefsekr., poste vicprez. de HES. En 1919 kurso en la Universitato de Budapeŝt. Kunranginto de la UK 1929. Persista laboranto: multaj paroladoj en kaj pri E, artikoloj.

Lorenz Fr. Vladimír, ĉeĥo, laboristo. Aŭtoro de la unua ĉeĥa E-lernolibro, 1890. De 1890 loĝis en Brazilo, Sao Feliciano, kaj daŭre partoprenis la movadon. Aprobis la idistajn reformojn, sed poste deklaris sin fidela al E. (Bohema E-isto, 1910, V. p: 39.) En 1930 aliĝis al Nov-Esperanto, rezigninte pri sia propra projekto »Mundial«. (v. p: 62 kaj 89.)

Louis (luis) R., franco. Kunfondinto de la asocio »Paco Libereco«. Adm. kaj kunlab. de Int. Socia Revuo, 1907—09 kaj red. de *Le Travailleur* E-iste, 1912—14. Trad. broŝurojn.

Loweil (loel) Daniel Ozro Smith, usonano, edukisto, Nask. 13 apr. 1851 en Denmark (Maine), mortis 12 marto 1928. Estro de »Roxbury Latin School« en Boston 1909—21. Prez. de EANA 1909—10. Ano de LK 1908—18. Tradukis Evangelion de Sankta Johano en 1910. Helpa red. de Amerika E-isto 1911—12. Verkis lernolibron.

Loy (loj) Karl Josef, germano, distrikta vicprefekto. Nask. 30 marto 1888 en Passau. Kunfond. de ES en Bamberg, 1908, fondis la ES en Erlangen, 1909. Ekzamena komisaro kaj ĝis 1930 LK. Fervora kursgvidanto. Tradukis kaj verkis poemojn, skribis multajn artikolojn en kaj pri

E. Verkoj: *Lehrbuch der Welthilfssprache E*, 1921; *Spielend E*, 1921; *Mehrsinnige deutsche Wörter in E*, 1921; *Die erste E Stunde*; *Vortareto G-E*, 1923.

Lozo: ps. de Leono Zamenhot (v.)

Lu ŝi-Sin, ĉino. Unua pioniro en centra kaj norda Ĉinujo. Lernis E-n de rusa E-isto. Ekpropagandis en 1909. E-igis K. C. ŝan. Fondis EA-n en Shanghai, 1912; (refondis ĝin, 1919). Gvidis la tutan movadon kun ŝan en centra Ĉinujo antaŭ la milito. Revivigis la movadon tuj post la milito. Kunlaboras energie kun Nuĵez. Verkis la libretojn: *E*; *E por Ĥino*; *Konversacio*.

Lübek Elisabeth, estonino, instr. Nask. 6 dec. 1896 en Tallinn. Multe prop-is E-n en la lernejoj sferoj. Instruis la lingvon en la rusa popola univ. 1917—18, en la instr. seminario 1924 kaj de 1922 ĝis nun en la II. urba elementa lernejo (ĉiuj en Tallinn). Ano de la ekzamena komisiono. Funkciulo de E-Societoj. Kunlaboris al la E-Estona Vortaro de VoKo kaj por la Estona Antologio.

Luczenbacher (luczenbacher) László hungaro. Mortis dum la milito. Járta tradukisto. Trad. Du Noveloj de Jókai. Kunlaboris al Juna E-isto, *La Revuo*.

Lukács (lukáč) György, d-ro, hungaro, politikisto, eksministro. Nask. 1865 en Nagyvárad. Patrono de HES. Dum la UK en Budapeŝt malfermis per parolado la Som. Univ.-on.

Lukács (lukáč) Gyula, d-ro jura, hungaro, finanĉconceptisto. Nask. 1897 en Siklós. E-isto de 1926. Fondis la E-Sekcion de la H. Nacia Asocio, kiu sendis lin en 1929 Aŭstrujon kaj Italujon, en 1930 Bavarujojn, Nederlandon, Belgion kaj Anglujojn, en 1931 Francujon por fari prezentadojn pri Hungarujo; entute 40 prezentadoj Estinta ĉefsekr. de HKES kaj ĉeforganizanto de la Kat. E-kongreso en Budapeŝt (1930). De 1933 agadas en Pécs.

Lukáš Miloš, ĉeĥoslovakio, gimn. prof. en Trnava. Nask. 15 sept. 1897 en Jilemnice. Tradukinto de multaj ĉeĥoslovakaj prozaĵoj kaj precipe poeziaĵoj. Memstare aperis traduko de

historia komedio de J. Vrehlicky: Nokto en Karlöv Tyn, 1921.

En lia brila interpreto
Poemoj ĉefaj klokventas.
Trasento, formo, rimo-meto
Pri vers-genio dokumentas.

(Kalocsay-Rimportretoj)

Luksemburgo. En ĉi tiu landeto (300.000 enloĝantoj) agadis kelkaj E-istoj en la unuaj jaroj de la 20-a jarcento. Laŭ la artikolo en UEA-Jarlibro, 1928, la unuaj E-istoj en L. estis M. Yuckun en Rodange (1902) kaj f-ino J. Jacques; laŭ detaloj en la ŝirjaeva manuskripto la unuaj pioniroj estis (en 1901) d-ro Foveau de Courmelles, kiu aperigis prop. artikolon en «L'Indépendance Luxembourgeoise» (11 apr.), M. Yuckun en la Madeleine kaj Jos. Heymes en Rodange. En la Ido-skismo ĉiuj fariĝis Idistoj. Ekzistis kelkaj viglaj Ido-grupoj, okazis kelkaj int. Ido-kongresoj, sed iom post iom la movado malvigligiĝis kaj disfalis. Diversaj klopodoj estas faritaj por reenkonduki E-n, precipe en 1922, kiam la kongresoj de IKA (v.) kaj MOKA (v.) okazis en L. kaj uzis E-n, kaj en 1931, kiam R. Kreuz, dir. de ICK, vizitis la landon. En kelkaj int. kongresoj okazintaj en L. E-istoj partoprenis kaj propagandis. Organizita movado ankoraŭ ne ekzistas; E-istaj gazetoj havas kelkajn abonantojn; de 1933 estas del. de UEA en la ĉefurbo Luxembourg. En L. aperas la E-gazeto: La Juna Batalanto.

W. SOLZBACHER

Lumbildmetodo. Nova instrumentado en E kies iniciatantoj kaj aŭtoroj estas d-ro F. Szilágyi kaj T. Czitrom. La unuaj provoj okazis en 1932. La metodo, kiun la aŭtoroj uzis kaj uzas en siaj svedlandaj kursoj, baziĝas sur la konsidero, ke la projekciitaj simplaj karikaturoj kun la parolo de la instruisto fiksas la memorkapablon el pli multaj direktoj ol la kutimaj instrumentadoj. La projekciitaj bildoj ne prezentas ĝenerale objektojn (substantivojn), sed movojn, sentilustrajojn (verbojn) kaj kvalitatojn (adjektivojn), ĉar laŭ la aŭtoroj tiuj estas pli gravaj al la komencantoj ol la montreblaj, aŭ anstataŭeblaj — per pronomoj — substantivoj.

Lundgren John Valentin (ps. Rigardanto), svedo, fervoja supera oficisto. Nask. 22 aŭg. 1870 en Uppland. Kunreorganizinto de la E-movado en Svedujo, 1908. Honora membro de SEF. LK. Tradukaĵoj kaj artikoloj en La Revuo, Tra la Mondo k. a.

Lundström S. Alfred, svedo, dua pastro en Jettendal. Nask. 23 apr. 1862 en Hofby. Unu el la pioniroj de E en la lando. Fond. kaj unua prez. de la unua sveda EK, Uppsala, 1891. Kunverkis la unuan S-E vortaron, 1893.

Lüneman J., nederlandano. Nask. en 1887, mortis en 1920 en Hindujo. Helpis fondi la unuan laboristan E-grupon en Hag, 1907 kaj administris ties organon Frateco, 1908—09. Poste faris pioniran laboron por la katolika movado. Skribis prop. artikolojn, administris la gazeton Ned. Katoliko kaj eldonis katolikajn E-broŝurojn.

Luno de Izrael. Romano de Haggard, el la angla trad. Payson kaj Butler. 1928, XII kaj 220 p. «Interesa romano de konata verkisto de aventuraj rakontoj. La lingvo estas simpla, flua, ĉiam facile komprenebla.» (Akademia Raporto, 1930.)

Lutkie (lutki) W., nederlandano. Pioniro de la katolika E-movado. Estrarano de NKEL. Paroladoj, broŝuro.

Luyken (lojken aŭ luken) Heinrich August, nask. germano, angliĝis en 1910. Nask. 10 dec. 1864 en Allenkirchen, Germ. Edukiĝis en Düsseldorfa gimnazio. En 1885 venis en Anglujon; edziĝis al anglino. En 1904 konatiĝis kun E kaj tuj entuziasme propagandis ĝin. Liaj originalaj E-romanoj, Paŭlo Debenham, 1912; Mirinda Amo, 1913; Stranga Heredaĵo, 1922; kaj Pro Iŝtar, 1924, estas ĉiuj konstruitaj sur unuforma skeleto: — inter la ĉeffiguroj troviĝas ĉiam unu, kies kristanan kredon subfosis iaj herezaj delogoj aŭ personaj malfeliĉoj. Tio kondukas lin — aŭ eble ŝin — en periodon de anima turmentigo kaj materialaj danĝeroj, el kiuj lin savas aliaj herooj, kies »simpla kredo« restis tra ĉio neŝancebla. Tiun moralan armaturon la aŭtoro uzis, dezirante serviĝi E-n al la disvastigo de liaj religiaj idealoj. Konforme al sia

simpla, klare fiksita vivkoncepto li kreis figurojn, kiuj nekonfuzeble reprezentas la potencojn de bono aŭ de malbono. Efektive liaj ĉefherooj estas karaktere tiel perfektaj, ke ili perdas sian naturan homecon. Sekvas, ke en tempo de psikologiema kaj realisma literaturo liaj romanoj impresas iom arkaikaj, kaj estas facile taksaj maljuste ilian valoron. Formetinte sian kritikan analizemon, oni devas konfesi, ke en la limoj de eksmoda skolo L. sciis verki bonstilajn romanojn, kiuj ĝisfine tenas la intereson dank' al la intrigaj aventuroj kaj amhistorioj, kiujn li plektis ĉirkaŭ la moralan kernon. Cetere la kredkonflikto en la animo de la »herezema« heroo estas tiel simpatie pentrita, ke la leganto konsente sekvas ĝin. Postmilita en Stranga Heredaĵo L. eĉ pli forte emfazis sian evangelismon, opinante, ke renaskiĝinta Kristanismo devas doni moralan forton al la nebuleca E-ismo, kiu, kun ĉiuj aliaj pacmov-

adoj, ne povis eĉ iomete malhelpi la sangan interbuĉadon. Pro Iŝtar, la plej sukcesa el la kvaroj, havas kiel historian fonon la antikvan Babilonon, en la tempo de la biblia Ijob, kiu aperas kiel figuro en la romano. — Ĉiuj liaj verkoj transskribiĝis Brajlen. Verkis aŭ tradukis multajn aliajn verkojn; lastatempe: Palestino kaj la Biblio en la Kristana Revuo.

W. B. JOHNSON

Lyndridge (lindriĝ) Alfred Wheeler, anglo, instr. komerca. Nask. 25 dec. 1877 en Brierley Hill. Fondinto de komerca lernejo. Alfaro de Pitmana Stenografio al E.

Lyon. Urbo en Francujo; 571.000 loĝantoj, kies urbestro estas la politikisto Herriot, amiko de E. Radiostacio kun konstantaj E-disaŭdiĝoj; staciestro la E-isto E. Borel. — 7-a kongreso de SAT 12—16 aŭg. 1927; ĉ. 200 partoprenantoj el 15 landoj. Rilatoj kun LEA-oj. Program-projekto. BRUIN.

M

Macan Karel Emanuel, ĉeĥoslovako blindulo, muzika komponisto kaj instruisto de blinduloj. Nask. 1858 en Pardubice, mortis 6 febr. 1925 en P. E-isto de 1904. Prop. inter blinduloj en Ĉ. kaj ankaŭ eksterlande. Fondinto de SOĈNE 1922.

Macaulay (mak kaŭli) H., irlandano. Fond. kaj sekr. de Irlanda Ligo de Katolikaj E-istoj, 1928.

Macfarlane (mkfarlen) Agnes Gibson, skotino, librotenistino. Prez. de ES en Partick, del. de UEA.

Machaček (maĥaček) ĉeĥo, mortis en Wien. Iama prez. de Bohema EK en W. Sur lia tombŝtono jena enskribo: »Tie ĉi subtere putras nur la korpo morta, Sed ĉe ni animo Via restas, kara, forta; En dolor' senfina, ni konsolon havu nune. Ke ni nin revidos en la eterneco kune. — Bohema Klubo E-ista en Vieno.

Macho (maĥo) Adolf, aŭstro-germano, instr. de burĝlernejo kaj dir. de faka lernejo. Nask. 20 aŭg. 1856 en Topkowitz (nun en Ĉeĥosl.) mortis 26 dec. 1932 en Wien. E-isto de 1906. Fondis en 1908 la duan ES en Wien la »Fideleco«, kies prez. li estis ĝis la morto. Multaj kursoj, ankaŭ por lernejoj. Dum kelka tempo prez. de Instruista ES. Tradukoj de multaj germanaj poeziaĵoj (precipe en manuskripto.)

Macuda Cunejiro (-roo), japano, kuracisto. Nask. 25 apr. 1869 en Nara-ken, mortis 17 feb. 1931. E-isto de 1906, (sub n-ro 16486). Por provi kompreneblecon de E, sendis sian unuan leteron al Z kaj ricevis respondon de li. Del. de UEA. — (Niŝida.)

Macuzaki Kacumi, japano, oficisto

de vivasekura kompanio. Nask. 26 febr. 1901 en Tokyo-si, mortis 2 febr. 1926 tie. E-isto de 1916. Por 1925 reprezentanta komitatano de JEI. Energie laboris por E kaj kunlaboris por E Junula Ligo (iama socialisma grupo). Verkis J. tradukon de Vivo de Z de Privat, 1923, kaj Facilan Legajon kun Komentario 1924.

Mačernis J., litovo. De 1911 ano de Kaunas-a ES. Multaj kursoj, artikoloj, prop. broŝuro, vortareto E-L. Estis red. kaj adm. de Litova Stelo. Ĉefe per liaj penadoj kaj red. aperis Litova Almanako. Trad. ĉ. 12 verkojn de L. Tolstoj, el kiuj parto jam aperis presite.

Madagaskaro, Afriko. Pioniroj estis P. Bourdier kaj M. Ravelojaona en Tananarive en 1901 kaj P. Lemoine en Diego-Suarez en 1903. En 1905 en T. estis fondita EG, samjare fondiĝis EG ankaŭ en Ankadifotsy. La gazeto »Le Courrier de T.« presis E-kronikon kaj artikolojn. En 1907 estis fondita grupo malgaŝa kaj grupo en la 13-a regimento de kolonia infanterio kun 30 membroj. Laŭ Dietterleŝtatistiko en 1928 nur unu E-isto troviĝis sur la insulo. Laŭ ICK-raporto 1929 »troviĝas jam notinda nombro de E-istoj indiĝenaj.« Malgaŝa ŝlosilo en preparo. UEA-del. en 1933 nur en Fianarantsoa. * I. SIRJAEV.

Madeiro Insulo. En 1908 estas fondita EG en Funchal, kie ankaŭ nun funkcias grupo. En 1933 UEA-del. en Funchal, Ponta Delgada kaj Sao Jorge. »H. J. Gomez de Freitas en Funchal daŭrigis sian regulan gazetan laboron.« (ICK-raporto, 1932.)

I. SIRJAEV.

Maeda Tutomu, japano, kemiisto,

ano de »The Institute of Physical and Chemical Research«, Tokyo. Nask. 14 febr. 1895 en Kanazawa-si. E-isto de 1925. Ekskluzive en E li publikigas multajn studojn pri kemio de 1926 kaj donas fortan instigon al sciencistoj por E. Verkis: Koloidkemia Terminaro E, Angla, Germana, Franca, 1929.

Maeder (meder) Rudolf, Gottlieb, sviso, d-ro apotekisto. Nask. 22 apr. 1900 en St. Gallen. E-isto de 1928. Li E-igis pro tio, ĉar dum sia polanda vojaĝo li ne kapablis interkompreniĝi kun persono, kvankam li konis 5 eŭropajn lingvojn. Kunfond. kaj prez. de Nova EK en St. Gallen, prez. de SES de 1932. Kunlaboranto de Int. Med. Revuo.

Mahn (man) Georg, germano, komercisto. Nask. 14 majo 1873 en Breslau, mortis(?). Entuziasmulo por ĉiuj idealaj celadoj li akcelis E-n precipe en pacifistaj kaj laboristaj rondoj. Verkis gramatikon kaj trad. Al la forbuĉataj popoloj de Romain Rotland.

Mair Albert, aŭstro-germano, fakinstruisto kaj instr. de itala kaj franca lingvoj, pensiulo de la urbo Wien. Nask. 28 majo 1864 en St. Michael en Eppan (nun en Italujo.) Jam antaŭ 1900 li interesiĝis pri Volapük, ĉagreniĝadis pri ĝia netaŭgeco, poste ofte aŭdis pri E, sed opiniis ĝin nur vantaĵo samkiel Volapük. En 1924 per R. M. Frey estis varbita por E. En febr. 1925 per lia iniciato kaj helpe de Feubler aranĝiĝis 15 kursoj en la metilernejo Mollardgasse, Wien. En 1925 fondis la EG »Verda Stelo«. De 1925 gvidis multajn kursojn faris paroladojn. De 1927 loĝas en Innsbruck, kie li estis prez. de la EK. En 1926 verkis kaj eldonis »Kompleta Traktado pri la Prepozicioj kaj la Akuzativo«, en 1927 aperigis la verketon Vienaj Legendoj, en 1933 tradukis al germana kaj eldonis la E-romanon Hura de Baghy.

Major József, hungaro, prof. de lingvoj, red. de Oomoto Internacia. Nask. 2 febr. 1904 en Cece, Hung. Studis en la Univ. »Sorbonne« en Paris. Post okjara loĝado en Paris veturis al Japanujo, kie li fariĝis red. de O. I.

kaj gvidas kursojn E-ajn kaj nacilingvaj. Lernis E-n en Budapeŝt, Laborista Grupo, 1919. De tiam konstante propagandis, gvidis kursojn, verkis artikolojn. Gajnis unuan premion ĉe Floraj Ludoj. Estis sekr. de Oomoto Int. en Paris. Vojaĝadis tra Japanujo faris pli ol cent paroladojn, interesiĝis japanan gazetaron pri E.

Makbeto. Tragedio de Shakespeare, el la angla trad. Lambert. 1908, 123 p. »Lerta traduko. La versoj preskaŭ ĉiam facile fluas. Malpli por prezentado ol por legado.« (L. I. 1909, p. 136.)

Malamikete de las nacjes kadó (= malamikeco de la nacioj falu). Unua verso de himno, verkita de Z, laŭ la praformo de E, en 1878.

Malĉev Dimitr, bulgaro, teknikisto de arkitekturo, antaŭe instr. E-isto de 1908. Eldonis prop. gazetojn »Semo« kaj »Kulturo«, iom da tempo ankaŭ E-folion »Telegramo« (proveto por krei ĉiutagan E-gazeton). Fondis EG-n en Plovdiv, gvidis multajn kursojn.

Malfeliĉulo: ps. de I. Ŝirjaev. (v.)
Malgrandaj pensoj pri grandaj demandoj. Artikolaro kaj leteraro de prelato Dombrowski. 1908, 216 p. »La enhavo — skribas la aŭtoro — volviĝas ĉirkaŭ la eternaj demandoj pri Dio, pri homo, pri religio, pri homaro.« »Libro skribita en bonega lingvo E.« (L. I. 1909, p. 334.)

Maly (mali) Ferdinand, germano, policadministranto. Nask. 1 jun. 1867 en Leitmeritz (Ĉeĥosl.). E-isto de 1903. Fondis 11 grupojn, gvidis 26 kursojn. Hon. membro de la grupoj en Górlitz kaj Eisleben (Germ.). Verkis gramatikon, 1910.

Malmgren Ernfrid Carl, svedo, instruisto. Nask. 3 nov. 1899 en Köp- ing. Direkciano de SEI kaj fakestro de ĝiaj kursa, financa kaj statistika sekcioj de 1930. Sekr. de SEF de 1931. Sekr. de S. Instruista EF, 1929-1931. Prez. de S. E Turista Asocio kaj E Turista Komisiono. Organigis plurajn E kursojn en Stockholm kuu ekster- kaj enlandaj instruistoj de 1928; oficialajn E kursojn por svedaj instruistoj somere 1928 kaj dum 1929—31, subvenciataj de la registaro; prelegvojaĝojn de L. Sinha, 1929

—30, tiujn de Scherer, 1931. Efektiviĝis grandajn turistvojaĝojn inter Svedujo kaj Estonujo, 1929—31, kune kun H. Seppik. Ĉefdel. de UEA, 1933. Ĝen. sekr. por la UK en Stockholm 1934. Verkoj: Sveda Kantareto, 1931; 'Sistema Kurso de E' (kun Seppik), 1932, vendiĝis 5000 e-roj dum 5 monatoj; 'La E-Klubo', 1933.

Malmkvist Erik Vilhelm, svedo, fervoja oficisto. Nask. 1 sept. 1887 en Grums. E-isto de 1904. Revizoro de Eldona Societo E de 1929, prez. de Stockholma Grupo de 1933, estrarano de SEF de 1932.

Malriĉa en Spirito. Dramo, originale de Bulthuis. 1923, 66 p.

Malriĉa Knabo, kiu gloriĝis. Verkis Herben, Mrázkova kaj Pittner, 1930, 136 p. Vivo kaj agado de Masaryk, ĉefa fondinto kaj prez. de la ĉ. respubliko, (amiko de E).

Malto. Gustave Busuttill kaj Caruana Valletta estis la pioniroj de la movado. La unua el ili eklaboris en 1903, kiam en Misida estis fondata la unua EG, kies prez. estis la estro de la edukfako de la insulo, Napoleone Tagliaferro. 5 febr. 1905 estis fondata EG en Rabata. En 1906 aperis longaj prop. artikoloj en »Gazetta di Malto«, »Documenti Umani« kaj »Malta Letteraria«. En Silema aperis EG, same en Malta Virina EG. Samjare E Ligo »Malta Stelo« unuigis ĉiujn grupojn kaj en Silema, laŭ iniciato de Levanzin, estis aranĝata E festo kun paroladoj, kantoj kaj deklamado en E. En la sama urbo la rektoro de la lernejo de S-ta Ignatio kun pastro Dobson instruis la lingvon al 100 lernantoj. Poste la indiferenteco mortigis ĉion antaŭe taritan kaj laŭ la Dietterle-statistiko E-istoj troviĝis nur en 4 lokoj. I. SIRJAEV.

Manders Wilhelmus Johannes Arnoldus (ps. Réthel), nederlandano, gimnazia docento (greka kaj latina lingvoj). Nask. 24 apr. 1910 en Venlo, Limburg. Anstataŭanta ekzamenanto de NK. Trad. el la antikva greka, »Odysseas« de Homeros, 1932.

Manfred. Drama poemo de Byron, el la angla trad. Venancio da Silva. 1914, 56 p.

Mangada Rosenörn Julio, hispano, militisto. Nask. 30 jun. 1877 en Sankti-

Spiritus, Kubo, Ameriko. E-isto de 1906 kaj tuj komencis propagandi E-n per framasona gazeto. En 1911 kunfondinto de la gazeto »Homaro«, kiu publikigis en 1913 la politikan kaj religian deklaron de Z. Fondis en 1916 la Z-an Federacion kaj ĝian organon »Hispana E-isto« publikigita ĝis 1923. De 1928 ĝis 1930 publikigis »Hispana E«. De 1912 gvidis multajn kursojn. Reprezentis la hispanan registaron dum 5 UK-j. Nun estas prez. de HEA. Verkoj: »Helpanta temaro por ĉiuj landoj«, por lernigi rapide E-n, 1925; »Ferdinando la 6-a kaj Farinelli«, 1925; »Avila«, 1925; »Pri Hispanujo kaj ĝiaj popolkantoj« — Popolkantaro de Murcio; »Versajaro«, 1922; »El moderna hispana Parnaso« (diversaj poetoj), 1927; »Du junaj fraŭlinoj kaj Korneliino«, de Cervantes, 1927; kaj aliaj malpli gravaj. En 1934 aperis lia poemaro »Amelia kaj Marina« (amatora poezio).

Mannez Sanchez (sanĉez) Francisco, hispano. Nask. 20 majo 1888 en Cieste. E-isto de 1907. Por altiri la atenton de la samviliaĝanoj al la nova ideo, li skribis leterojn kaj poŝtkartojn al fremdaj E-istoj, al kiuj li rekomendis la adreson de la kafejo, kie li kutime iris en Cieste kaj efektive lia amikoj kaj klientoj de tiu kafejo scivoleme demandis al li pri tiu korespondado kaj tiamaniere li altiris la atenton de siaj samviliaĝanoj, ke baldaŭ li starigis EG-n. Li estis aŭto de la komitato por gastigo de aŭstro-infanoj en Hispanujo pere de E.

Manon Lescaut, Romano de abato Prévost, el la franca trad. Vallienne. 1908, 188 p. Tiu famega romano aperis en Nederlando (1731), kaj estis malpermesita en Francujo pro kontraŭmoraleco. Profundegan pasion reliefigas simple natura stilo. Traduko en bela literatura formo. L. BASTIEN.

Manoussou Roksan, helenino, filino de d-ro Stamatiadis. Nask. 6 dec. 1902 en Samos. Fond. kaj prez. de H. Virina E-Ligo. Ŝi organizis ofte E danckoncertojn, frekventatajn de la »plej bonaj rondoĵ« de Athen. Kursgvidantino.

Maraury Barredo Roberto, hispano, d-ro de med. kaj komercaj studoj,

dogana inspektoro. Nask. 3 jul. 1888 en Vitoria. Konstanta kunlaboranto de la ampleksa »Enciklopedia Espasa« kun E-a traduko de ĉiu titolvor- to. Publikigis verkojn kaj multajn artikolojn profesiajn. E-isto de 1908, UEA-ano de 1909. Fondinto de multaj grupoj kaj kunlaboranto de kelkaj revuoj.

Marchand (marŝan) Jean, (ps. Marc Hand), franco, ŝtatoficisto. Nask. 19 jan. 1905 en Mehun-sur-Yèvre (apud Bourges). Estis sekr. kaj poste prez. de la grupo de Vanves; helpsekr. de la Pariza grupo kaj de la Pariza federacio; sekr. de la »Verda Kato«; helpsekr. de la LĴK por la XXIV-a UK. Senlace laboris kaj propagandis.

Marchesi (markezi) Mirza, (ps. momo), italino, instr. de 15 jaroj en elementa lernejo de sia naskiĝvilaĝo Campo S. Martino, provinco Padova. Artikoloj en instr. gazeto, »I Diritti della Scuola«, kiu publikigis ankaŭ priskribon de ŝia vojaĝo al la UK en Edinburgh; ĝi aperis ankaŭ kiel broŝuro. Aliaj artikoloj en porinfana gazeto. Trad. la ĉefverkon de la itala porinfana literaturo, »La aventuroj de Pinokjo« de Collodi, 1930.

Marczell (marcel) Āgost, hungaro, d-ro, prof. mezlerneja, red. de ped. revuo, aŭtoro de tri hungarlingvaj dramoj. Nask. 24 aŭg. 1884 en Nád-szeg. E-isto de 1929. Vicprez. de HEKS. Gvidis kursojn laŭ Cseh-metodo.

Maresquelle (mareskel) Henri, franco, licea prof. Nask. 6 marto 1866 en Strasbourg. Post parolado de Bourlet (1903) li fondis grupon en Nancy, tre gravan en tiu tempo (pli ol 100 anoj), kaj gvidis publikan kurson en la granda amfiteatro de la Scienca Fakultato; poste propagandis en la tuta regiono. Broŝuroj, artikoloj.

Maria Magdalena. Kvinakta tragedio de Hebbel, el la germana trad. B i s c h i t z k y. 1922, 80 p. »La interlukto inter personoj kaj sentoj proksimigas tiun burĝan familian scenaron al klasika nobla tragedio. Bone E-igita.« (G. S. 'E', 1923, p: 45.)

Mariavitismo. Religia movado naskiĝinta en Polujo (Plock) en 1887, en la naskiĝjaro de E. La Mariavit- o j vidas en tio signon, ke ĉiu adepto

de M. devas posedi E-n. Inicitinto estis »panjo« Mario Kozłowska (v.) antaŭe katolika monaĥino. Komence la movado estis kaŝa, sed post la ekskomuniko de la Roma papo en 1906 ĝi malkaŝe deklaras sin kiel nova (registrita) eklezio. M. distingigas de la romkatolikismo: Diservoj okazas en nacia lingvo. Celibato forigita, la pastroj edziĝas kun pastrinoj. Pastroj povas esti ne nur viroj (nuntepe ekzistas 57 pastrinoj kaj 1 arĥiepis- kopino). Pekkonfeso okazas ne antaŭ pastro sed senpere antaŭ Dio mem. Estas permesite al ĉiuj legi ĉi- ujn librojn. Forestas devigaj fastoj. La pastroj ne estas pagataj. Ĉefa sidejo: la Sanktejo de Mizerikordo en Plock. La pastroj devige posedas E-n. La eklezio eldonas gazeton en E (»La Juna Mariavito« kaj »Ren- konte al la Suno.« E. WIESENFELD.

Marignoni (marinjoni) Daniele, italo d-ro jura. Li loĝis en Crema, Lombardio. Mortis antaŭ multaj jaroj. Eksvolapŭkisto. Li estis la unua kaj dum sufiĉe longa tempo la sola itala E-isto. Verkis kaj eldonis la unuan lernolibron de E en itala lingvo en 1889.

Maristoj. Antaŭmilite E havis multajn adeptojn inter maristoj de diversaj landoj, dum kelka tempo ekzistis eĉ »Marista Ligo de E-istoj«, kiu aranĝis kursojn en havenoj kaj apudmaraj urboj. En 1906 maroficiro P. Mesny fervore propagandis E-n inter maristoj en Brest kaj en 1907 leŭtenanto de la franca kirasŝipo »Saint Louis«, K. Tarhner aranĝis kursojn por oficioj de la ŝipo. Same agis anglaj maristoj, aranĝintaj ekz. en 1911 sur la militŝipo »Vernon« ĉiutagajn kursojn por ŝipanoj. Ekzistis minist- eria cirkulero de 21 nov. 1921, laŭ kiu nedeviga instruado de E estis permesita en maristaj lernejoj de Ital- ujo. Marista Terminaro estas verkita de Rollet de l' Isle. 10 aŭg. 1934 dum la UK Marista Ligo E-ista refondiĝis. Sekr. oficejo en Kvicksund, Svedujo.

Marich (mariĉ) Āgoston, hungaro, estis poŝtoficisto, poste policoficisto; nuntepe li vivas en Nederlando. Nask. 19 nov. 1883 en Budapeŝt. E-isto de 1901 kaj komencis sian agadon kiel sekr. de la unua EG en

B. Baldaŭ fariĝis kaj ĝis la milito restis ĉefa aganto en la hungara E-movado. Post la milito li havis gravegan rolon en la polica E-movado. Fondis kaj eldonis ĉ. 10 gazetojn, el kiuj kelkaj aperis nur unu n-re. Pli gravaj estis la gazetoj »La Verda Standardo« (fond. 1907) kaj »La Polico« (fond. 1922). Verkis prop. broŝuron 1909, kiu aperis ankaŭ germane kaj rumane, kompilis gramatikon, 1908, ktp. — Pri lia interesa kariero 1. en la artikoloj »Hungarujo« (p:227) kaj »Polico«. Komp. ankaŭ la konstataĵojn de E. Drezén (»Analiza Historio«, p:63–64, 73), kiu diras i. a., ke M. apartenis al tiuj, kiuj entreprenis iun faron tute sen atento de la normalaj ebloj. Li estis ankaŭ unu el la plej grandaj E-kolektistoj.

Markau Emil Gustav Adolf, germano, popollerneja instr., preĝeja organisto. Nask. 26 sept. 1877 en Dierberg. E-isto de 1909. Prez. de la ES en Potsdam de 1910. Verkis germane malgrandan E-instruilon por la gast-eja profesio.

Marksismo — kiel universala scienca filozofio, bazita sur principoj de dialektika materialismo, celanta revolucion reconstruon de la tuta homarsocio kaj starigon de nova tutmonda senklasa kaj sennacia sociordo — liveras solidan teorion bazon por la ideo de L. I. En la verkoj de la kreintoj de marksismo — K. Marx kaj F. Engels — oni povas trovi multajn eldiraĵojn pri la lingvo, ĝia deveno kaj evoluo, kaj ankaŭ gravajn argumentojn pruvantajn necesecon de L. I. En siaj verkoj »La rolo de laboro en procedo de homiĝo de simio« kaj »Deveno de familio, privata posedajo kaj ŝtato« Engels detale analizis la kondiĉojn, en kiuj kreiĝis kaj evoluis la homa lingvo. En sia komuna verko »Germana ideologio« Marx kaj Engels skribis: »La lingvo estas same antikva kiel ankaŭ la konscio; la lingvo do estas ĝuste la praktika, ekzistanta ankaŭ por aliaj homoj kaj nur per tio ekzistanta ankaŭ por mi mem reala konscio; kaj simile al la konscio, la lingvo aperas nur el bezono, el la insista bezono rilati kun aliaj homoj... La lingvo estas produkto de gento... En ĉiu moderna

progresinta lingvo la originale memstara idiomo superiĝis ĝis nacia lingvo, parte pro historia evoluo de lingvo el preta materialo kiel en la romanaj kaj germanaj lingvoj, parte pro interkruciĝo kaj kunmiksiĝo de lingvoj, kiel en la angla, parte pro kuncentriĝo de dialektoj en unu nacia lingvo kondiĉita de l' ekonomia kaj politika kuncentriĝo. Estas memkompreneble, ke en sia tempo la individuoj plene prenos sub sian kontrolon ankaŭ ĉi tiun produkton de la gento.« Koncerne al la L. I., el tiuj ĉi marksismaj tezoj logike konsekvencas ke: 1. la bezono pri int. rilatoj naskas ankaŭ la bezonon pri L. I., 2. la interkruciĝo kaj kunmiksiĝo de lingvoj estas tute natura kaj historie pravigita bazo por L. I. kaj 3. la estonta L. I. devas kreiĝi ne spontanee, sed sub plena konscia kontrolo de la homoj, t. e. ĝi devas esti arte organizita konforme al aktuala stadio de ekonomia kaj politika strukturo de la homa socio.

En unu el siaj leteroj al Marx, Engels skribis: »Por Weitling estas malfeliĉo, ke li ne konas persan lingvon: li trovas en ĝi langue universelle toute trouvée' (tute pretan universalan lingvon)«. Ankaŭ Marx en sia antaŭparolo por »Mizereco de la filozofio« skribis: »La disĉipla verko de Proudhon pri universala lingvo montras, kun kioma sencereemonio li kaptadis eĉ tiajn taskojn, por kies solvo mankis ĉe li la plej elementaj konoj. Tiuj ĉi ambaŭ citaĵoj montras, ke Marx kaj Engels, ne kontraŭdirante la problemon pri lingvo universala, konsideris ĝin tre serioza kaj postulis almenaŭ ke la personoj dezirantaj solvi ĝin havu necesajn sciencajn konojn por tio.

Verŝajne kun konsento de Marx estis akceptita la sekvanta rezolucio de la 2-a kongreso de Unua Liborista Internacio en Lausanne 1867: »La kongreso opinias ke lingvo universala kaj reformo de ortografio estus universala bonfaro kaj forte akcelus unuecon kaj fratecon de la popoloj«.

Ankoraŭ pli grandan detaligon de la lingva problemo laŭ la marksisma vidpunkto oni trovas en la verkoj de Lenin, pri la nacia problemoj. Lenin

skribis: »La lingvo estas la plej grava rimedo por interrilato de la homoj ... Neniu privilegio nek por iu nacio, nek por iu lingvo! Nek la plej etan ĝenon, nek la plej etan maljustajon por la nacia minorito — jen estas la principoj de laborista demokratio ... La proletaro subtenas ĉion helpantan al forigo de la naciaj diferencoj, al falo de la naciaj interbaroj, ĉion farantan la rilatojn inter la nacioj ĉiam pli kaj pli densaj, ĉion kondukantan al kunfluiĝo de la nacioj. Agi alimaniere signifas ekstari en la flanko de reakcia naciema filistraro«. El tiuj ĉi tezoj de Lenin logike konsekvencas ke: 1) neniu nacia lingvo estas akceptebla kiel L. I., 2) estonte la nacioj devas kuniĝi »en supera unueco« kun forigo de ĉiuj naciaj diferencoj, do devas ekesti unu tutmonda lingvo.

Karl Kautsky skribis en sia verko »Liberiĝo de la nacioj«. »Tre strange, sed ekzistas socialistoj kiuj pasie bata'as kontraŭ asimiliĝo de la nacioj kaj iliaj kulturoj. Ili opinias ke kun malapero de diverseco inter la nacioj kaj lingvoj la mondo estus kondamnita al monotoneco kaj mensmizeriĝo ... Sed oni ne devas bedaŭri pri malapero de multlingveco ... Dividiĝo de la lingvoj malfortigis potencon de la homaro. Unuiĝo de la lingvoj signifus ĝian levigaĝon ĝis apogeo de potenco. Kontraŭstari tion estus reakcio ...«

Precipe klaran, netan kaj precizan formuligon de la marksisma rilato al la lingvo universala oni trovas en la verkoj de Stalin. Kontraŭdirante la tezon de Kautsky pri eventualeco de germaniĝo de ĉeĥoj se venkus proleta revolucio en Germanlando kaj Aŭstrio en mezo de la pasinta jarcento, Stalin diris: »la naciaj diferencoj ne povas malaperi en la proksima periodo ... ili devas resti ankoraŭ por longe eĉ post venko de proleta revolucio en tutmonda skalo ... kiam la socialismo plifortikiĝos kaj enradikiĝos en la moraro, la naciaj lingvoj neeviteble devas kunfluiĝi en unu komunan lingvon, kiu certe estos nek rusa, nek germana, sed io nova ... Oni devas ebligi al la naciaj kulturoj elevolui kaj disvolviĝi, el-

montri ĉiujn siajn potencojn, por krei la kondiĉojn por ilia kunfluiĝo en unu komunan kulturon kun unu komuna lingvo. Plenflorado de la naciaj laŭforme kaj socialismaj laŭenhave kulturoj en kondiĉoj de la diktaturo de proletaro en unu lando por ilia kunfluiĝo en unu socialisman (kaj laŭforme kaj laŭenhave) kulturon kun unu komuna lingvo, kiam la proletaro estos venkinta en la tuta mondo kaj la socialismo enradikiĝos en la moraro, — ĝuste en tio ĉi konsistas la dialektikeco de la leninista ekspono de la problemoj pri nacia kulturo.«

La problemoj pri helpa int. lingvo ĝis nun ne estas prezentita en la marksisma literaturo same klare kiel tiu pri la lingvo universala. Sed ĉiuj necesaj premisoj por ĝia pozitiva solvo logike konsekvencas el la supre eksponitaj tezoj: la neevitebla plua disflorado de la naciaj lingvoj kaj la plua intensiviĝo de l' internaciaj rilatoj necesigas helpan int. lingvon (sen domaĝi al la estonta komuna lingvo tutmonda); samtempe la marksisma koncepto pri la lingvo antaŭdifinas la formon de L. I. (sur bazo de interkruciĝo, miksiĝo, kuncentrigo kaj plua progresigo de la lingvoj konforme al la moderna kulturnivelo de la homaro) kaj ankaŭ la manieron de ĝia kreo (konscia artefara reguligo).

Senpere pri E ĝis nun nur malmultaj aŭtoritatuloj de marksismo ion diris en definitiva maniero. Estas konataj favoraj mencioj pri E de la sekvantaj famaj komunistoj: L. Krasin, Sen Katajama, A. Lunaĉarskij, M. Gorkij, H. Barbusse, F. Kon k. a. La vidvino kaj fratino de Lenin asertas ke li negative rilatis al E., sed en la verkoj de L. tiu ĉi aserto trovas nenium konfirmon.

Multaj verkoj pri marksismo estas eldonitaj en E, parte de SAT (»Komunista Manifesto«, »Kom. Dokumentaro«, »K. Marx, lia vivo kaj lia verko«), sed precipe de SEU kaj Ek-relo.

N. NEKRASOV.

Maroko, Norda Afriko. Unuaj pioniroj estis en 1906 francaj oficiroj. Kapitano Ferd. Redondo en 1913 fondis en Melilla ES. Laboris en Tanger R. Manfred (fotografisto, 1925), gvid-

is ankaŭ kursojn C. V. Richard. E-istoj troviĝas nun en urboj Ceuta, Tetuan, Casablanca, Meknes, Kénitra, Tanger, UEA del. en 4 urboj.

Rimarko. La artikolo'eton tralegis C. V. Richard. I. ŠIRJAEV.

Marr. Eltrovinto de la jafetida lingvoscience. v. Revolucio en la lingvoscience.

Marriott (marjot) Rhodes, anglo, kontisto. Nask. 24 aŭg. 1856 en Manchester. Sakĉampiono. Iama prez. de MES. Konsilanto de BEA, dumviva membro de UEA. Trad. diversajn literaturajojn por la E-gazetaro.

Marta. Romano de Eliza Orzeszko, el la pola trad. Z. 1910, 237 p., dua eld. 1924. »Ne tre novmoda, sed ĉiam kortuŝanta estas la priskribo pri la malgaja vivado de malfeliĉa vidvino kaj patrino. Nedubebla estas la arta kaj homa valoro de l' historio kaj taŭgeco de ĝia traduko.« (G. S. 'E', 1924, p. 125.)

Martinez Aloy (aloy) José, hispano, eksurbestro; mortis. Atingis daŭran subvencion por E ĉe la Valenciana urbestro.

Marto. Gazeto en E kaj germana lingvo. Ekiris en 1912 en Graz, dumilite ne aperis, reeldonis kaj red. J. Taubmann en 1920 en Bor (Haida), ĉesis en 1934. Formato 28×21. (v. p. 93).

Maruzzi (maruci) Dušan, kroato, d-ro de juro, ĉefo de la statistika oficejo en Zagreb. Nask. 1 jul. 1883. E-isto de 1919. Tuj li okupis plej elstaran rolon. Organizinto de la unua jugoslava E-kongreso, 1923. Unu el ĉelaj preparintoj de la tutŝtata asocio JEL, 1923. Multjara prezidinto de la zagreba societo. Unua kaj nuna prez. de JEL. Fondinto de la Sudslava E-Servo, 1922. Iniciatinto de unua jugoslava E-organo »Provo«, »Konkordo«, (1921). Verkinto de E gramatiko (ĝis nun tri kroataj kaj unu slovena eldonoj) kaj (kunlabore kun I. Rotkvič) de la K-E vortaro. En 1929 akiris ĉe la komerca fakultato en Zagreb docentecon pri E. Sen-nombraj prop. paroladoj en multaj jug. urboj, multego da artikoloj en naciaj gazetoj, pluraj kursoj.

Maschl (maŝl) Otto (ps. Lucien Laurat, ĝis 1928 Lucien Revo), aŭstri-

ano, verkisto. Nask. 27 dec. 1898 en Wien. Verkis pri politiko kaj precipe pri ekonomio en servo de la marksista idearo ekde 1918, gvidis kursojn pri tiuj temoj. Paroladis en E-grupoj, kunlaboris al 'Sennaciulo' kaj 'La Nova Epoko'. Partoprenis kelkajn SAT-kongresojn.

Mastny Jaroslav, ĉeĥoslovako, ŝuofabrikisto en Olomouc. Nask. 29 apr. 1892 en O., ano de Moraviaj E-Pioniroj, kiu zorgas precipe pri la financa flanko de la eldon-entrepreno, kun rimarkindaj sukcesoj kaj ofero.

Matematiko. Inter la E-istoj sin trovas proporcie pli da matematikistoj ol da filologoj, kaj en la komenco de la movado preskaŭ ŝajnis, se oni juĝis laŭ la adeptoj, ke E estas ne lingva sed nombra afero. Bourlet, Briand, Meray, Berdelle, Dombrowski, Saussure, Bricard, Laisant, Th. Rousseau kaj multaj aliaj estis matematikistoj, kiuj sopiras al klareco, simpleco, logikeco. La matematikistoj preskaŭ trovas la idealon en matematika skribmaniero. La pazigrafio, precipe en decimale sistemo, kontentigas eĉ altajn postulojn. Krom tio la matematiko en ĉiu nacio havas nur malgrandan adeptaron, kaj mem la revuoj de la matematikistoj preskaŭ ĉiuj suferas finance pro defecito. Ne estas sen intereso, ke la matematika terminaro de Bricard (1905) estis la unua faka vortaro de la E-istoj. Jam antaŭ la milito aperis kelkaj (eĉ gravaj) mat. verkoj en E. (v. BIL: n-roj 4629, 4637, 4979, 4980, 4982—4.) O. SIMON.

Mateo Falcone kaj aliaj rakontoj de Mérimée, el la franca trad. Jean Borel. 1926, 62 p. »Malnova Z-a stilo. La noveloj estas ekscitaj, realistaj, psikologiaj.« (O. S., La Socialisto, 1926, p: 67.)

Matthews (mathjuz) Paul, anglo, M. A. Nask. 21 febr. 1855 en Stourbridge. Mortis 11. aŭg. 1933. Interesiĝis pri E en 1890 kaj faris multajn pionirajn paroladojn. Prez. de grupoj en Letchworth kaj Luton. E-isto n-ro 7799.

Matthews (mathjuz) William Herbert, anglo, komercisto, desegnisto, radio-amatoro. Nask. 20 jun. 1897 en Hither Green. Sekr. de BEA Radio-

komitato de 1926, membro de Radio-Statistika Komisiono de ICK, iama sekr. de IRA kaj IRS por Britujo. Kunlaboranto de kvinlingva Radio-amatora Vortaro (Ginz).

Mattón (maton) Pierre Ernest, franco, generalo. Nask. 19 jan. 1855 en Grasse (apud Nice). Estis militista reprezentanto de Francujo apud la franca ambasadoro en Rusujo, poste komandanto de Besançon. Jam en 1902 fervore propagandis per multegaj paroladoj, gvidis kursojn, sendis poŝtkarton, kiu trakuris la tutan mondon. Verkis: 'Cours complet d' E', 1906. L. K. de 1905.

Matuba (-cu-) Kikunobu, japano, desegnisto. Nask. 9 apr. 1903 en Yokosuka. E-isto de 1921. Multaj artikoloj pri konstruo de E-a poezio en E-Lernanto kaj LRO, 1934. Bona studento de E-gramatiko. — (Kuw.)

Mátyás (matjás) József (ps. M-ás; -isto), hungaro, instruisto en Debrecen. Nask. 13 jul. 1899 en Ajak. E-isto de 1929. Kursoj, prop. artikoloj. Komilis 25 bildo-albumojn E-lingvajn por eksterlandaj lernejoj. Malgrandaj literaturaĵoj en la Verda Stelo; HDE; Pola E-isto.

Mawson (mason) Eric Gordon, brito, sekr. de norda kaj mezlanda Federacio de Societoj por helpo al ekskrimuloj. Nask. 1894 en Birkenhead. E-igis 1918 dum malliberiĝo kiel pacifisto. De 1921 multe instruis. Sekr. de Eduka Komitato de BEA Ekzamenisto pri E por la Reĝa Societo de Artoj.

Maynar (majnar) Manuel, hispano, advokato. Propisto, prez. de EG en Zaragoza. Li helpis Gaston (v.) alvenigi post la milito la aŭstriaĵn inangvian pere de E.

Mayor (mejr) John Eyton Bickersteth, anglo, prof. de latina lingvo en la Univ. Cambridge. Nask. 1836 (?) en Beddegawa, Cejlono. Prez. de la Vegetara Societo. Eldonis diversajn tradukojn aŭ komentariojn pri latinaj aŭtoroj, precipe Juvenal. E-istiĝis en 1907. Lia parolado en la UK en C. fariĝis historia. Forte subtenis E-n kontraŭ reformistoj kaj pledis por ĝia enkonduko en la lernejoj.

Mazepa. Tragedio en 5 aktoj de Slowacki, el la pola trad. Grabowski,

1912, 87 p. Ludita dum la UK en Kraków, 1912. »Historia tragedio pri romantika amo. Unu fojon pli Gr. sin montris vera majstro en nia lingvo.« (C. A., La Revuo, VII. vol., p: 94.)

Mazzolini (macolini) Alessandro, italo, prof. de desegno, belskribado, lerneja manlaboro. Naskiĝis 28-an de februaro 1857 en Pievetorina (Macerata). Mortis 16. jan. 1934 en Fano (Italujo). Pretiĝis verkon pri »RA-DO« (Rapida Skribo), speco de stenografio, ma'pli rapida, sed mul'e pli facile lernebla. Li unue aliĝis al Volapük, poste transiris al E. Dum sia multjara laborado por E, vere modela kaj nelacigebla, li kunlaboris en la redaktado de 8 E-gazetoj, verkis 3 gramatikojn kaj 4 vortarojn, kaj gvidis pli ol 20 kursojn en Terni, Città di Castello kaj en Perugia. Interalie li kunlaboris en 'E' de UEA, en L. M. kaj en 'Ondo de Daŭgava'. Unu el liaj vortaroj estis la 'Geometria Terminaro' kun multaj figuroj. Peita de Cart li zorgis kun aliaj E-istoj pri la itala parto de la 'Oficiala Klasika Libro'. Lastatempe aperis liaj verkoj 'Ekzercilo por supera praktika kurso de E' kaj ĝia aldonajo, la 'Helpilo'. Liaj verkoj ricevis laŭdojn de diversaj kompetentuloj, kaj prezentas rezulton de tre konscienca kaj vastega laborado.

McCormick (mak kormik) F. R. A., M. A., irlandano, subprofesoro ĉe Univ. Dublin, ing. Nask. en 1895. E-isto de 1913. Fondis IEA, 1925 kaj estas ĝia sekr. Redaktis 'Irlanda E-isto'. Tradukis kun Brown 'Pri la origino de l' homo' de prof. A. Keith. Lia biblioteko enhavas pli ol 2500 E librojn.

Mcfadyen (mkfadjen) John Edgar, B. A. (Oxon), M. A., D. D., skoto, prof. de lingvo, literaturo kaj teologio de Malnova Testamento ĉe Univ. Glasgow. Nask. 17 jul. 1870 en G. E-istiĝis 1907 en Chautauqua, Usono.

Mecenoj. Per la vorto »meceno« oni indikas larĝaniman bonfaranton de arto, de scienco, de movado. Ĝi devenas de persona nomo romana, aristokrato el tempo de imperiestro Augusto, Maecenas, kiu havis tiun kvaliton de subtenemo. Ankaŭ la E-

Movado havas siajn mecenojn. Tute precizajn detalojn oni ne povas trovi, sed pri jenaj bonfarantoj la informoj estas tute fidindaj.

D-ro Emile Javal (1839—1907) kuracisto, postlasis al la tiama Centra Oficejo (v.) en Parizo sumon de 80.000 Fr. (ora valoro).

Generalo H. Sebert, la fondinto de la Centra Oficejo E-ista, dum jaroj larĝe subtenis finance. Laŭ prudentaj taksoj (ciferoj ne estis publike konigitaj) li donacis tiel sumegon de 200.000 Fr. (antaŭmilita valoro).

René de Saussure, ĝeneva patrioano, nepo de la fama naturisto kaj scienculo Horace de Saussure, fondis en Genève, Sciencan Oficejon E-istan, eldonis la tiutempe imponan Sciencan Revuon kaj ĉiel subtenis la movadon.

Hector Hodler, kunfondinto de UEA, profesie sed sensalajre laboris kiel dir. de la Asocio. Postlasis al UEA kapitalon de 180.000 Fr. sv. plie la riĉan bibliotekon kaj donacis al ĝi la gazeton „E”.

Harold Bolingbroke Mudie, (London) multe subtenis finance la Britan Asocian kaj UEA, kies unua prez. li estis. Lia patro testamente je memoro de filo donacis al BEA kaj UEA belan sumon.

D-ro Albert Steche, Leipzig, eks-prezidanto de la GEA, donacis al GEA antaŭ la milito la sumon de 10.000 markoj.

Kuracisto Buchanan en London donacis sumon de 4000 funtoj (1930) por fondi katedron de E ĉe la Univ. de Liverpool, donacis al BEA 1000 funtojn. G. AGRICOLA.

Krom la nomitaj mecenoj troviĝas multegaj E-istoj, kiuj per grandaj aŭ malgrandaj sumoj subtenas diversajn E-societojn, aliaj — kiel lastatempe ekz. Gino Catarzi — ebligas eldonon de valoraj libroj.

Medem Paŭlo, litovo, vicolonelo en la rusa armeo, de 1906 bankiero. Nask. 8 dec. 1862 en Kaunas, mortis 1 jan. 1925 en K. E-isto de 1910, gvidinto de la movado en K; post la gmondmilito la ES kunvenadis en lia loĝejo. Gvidis kursojn, ankaŭ en la universitato. Verkis lernolibron por rusoj. Multe kunlaboris en diversaj E gazetoj, precipe en „E Triumfonta”

kaj „HDE”. En apartaj libretoj aperis tradukaj el L. Tolstoj: ĉapitro el „La Vojo de l' Vivo” kaj de Avsejenko: „F-ino Suzano”. Subtenis la eldonon de kelkaj lernolibroj, ankaŭ tiun de „Litova Almanako”. Estis L. K. kaj Akademiano.

Medgyesi (medjeŝi) János, hungaro, estis prof. de surd-mutula instituto, nun loĝas en Hódmezővásárhely. Ĉ. 55 jara. Antaŭmilite tre agema prop-isto, kursgvidanto, sekr. de HES. Red. de „H. E-isto”, 1910; „Sciiganto”, 1908 kaj tiu de „H. Studento”, 1910—12. Verkis detalan gramatikon kun vortaroj, 1910.

Medic'no. (Ĝis la TEKA-fondo.) Pro sia ĉiam plej vigla evolado, ankaŭ pro sia plej profunda koncentriĝo al la homa vivo, medicino sentas bezonon je int. lingvo pli akre ol aliaj sciencoj. De la komenco de la E movado oni povas vidi en la vicoj de la pioniroj grandan nombron de medicinistoj, ankaŭ multajn med. gazetojn, kiuj iom post iom, malfermante siajn kolonojn por artikoloj pri kaj (poste) en E, faris netakseblan servon.

La unuaj gazetoj, favore rilatintaj al E kaj aperigitaj pri ĝi artikolojn, estis: »Vrač», presinta en 1899 serion da prop. artikoloj de Ostanjevič, »Actualité Médicale», Médecine Internationale Illustrée kaj »Nouvelles Médicales», enhavintaj en 1900 similajn artikolojn de d-ro Foveau de Courmelles, »Bolettino Medico di Salsomaggiore» (1903, artikolo de S. Meyer), »Médecin» (Bruxelles, 1904), »Archives de Thérapeutique» (1904), »La Chronique médicale» (1904), »Psikiatria kaj Neurologia Revuo» (Grukujo, 1905), »Revista Medico Social» (1905, artikolo de M. Monteagudo) k. a.

La unuaj paroladoj por ekinteresiĝi medicinistojn pri E estis farataj en Rusujo: 19 okt. 1898 Kazi-Girej legis en la med. societo de urbo Borisoglebsk raporton pri E kaj la kunveno esprimis la deziron, ke E estu elektota kiel oficiala lingvo por int. kongresoj de medicino, kaj ke ĉiuj plej gravaj med. verkoj estu eldonataj en E. La saman raporton laŭlegis d-ro

Fedjaevski 25 okt. en la med. societo de Voronej.

Kun la sama celo en 1904 laŭ iniciato de d-ro P. Rodet kelkaj kuracistoj fondis en Francujo Med. Grupon E-istan. Samjare aperis en E la unuaj med. librotoj: »Por niaj filoj kiam ili estos dekokjaraj« de A. Fournier kaj »Raporto hidrologia kaj med. pri la termala ŝlimbanejo de Saint-Amand-les-Eaux« de d-ro Thiroux.

I. SİRJAEV.

Post fondo de TEKA. 1907. Dum la 3-a UK en Cambridge la unua fakkunsido de E-istaj kuracistoj. Prez. prof. Dor, Lyon, sekr. Whitaker, Liverpool. Mikolajski, red. de pola med. revuo ,Voĉo de Kuracistoj' (Kraków) komencis aperigadi E aldonon en la gazeto; sekve vekigas kuracistojn en multaj landoj.

1908. Artikolo de W. Robin en ,V. de K.', alvokinta al fondo de E med. organizajo, kies fondiĝo okazis dum la UK en Dresden, sub nomo de Tutmonda E-ista Kuracista Asocio (TEKA). Prez. fariĝis prof. Dor, vicprez. Mybs, Altona kaj Whitaker, kas. prof. Soullier, Lyon, sekr. W. Robin. Oficiala organo: ,V. de K.' TEKA laboris de la komenco kontentige.

1909. Estis fondata kiel filio de TEKA: Tutrusa E Kuracista Societo; estis fondata ankaŭ Studenta Sekcio sub gvido de Badert, Tours. Aperis la unua jarlibro de TEKA kun antaŭparolo de Z, kun plena nomaro de 19 landaj konsuloj, 41 urbaj reprezentantoj kaj 428 anoj.

1910. Riĉenhava dua jarlibro: 33 landaj konsuloj, 100 urbaj repr. kaj 700 anoj. Dum la grandioza int. med. kongreso en Budapeŝt sukcesa E kunsido, aranĝita de TEKA. Prez. Schatz kaj Kováts, ambaŭ el Budapeŝt, med. raportojn en E legis Cailaud, Monaco; ŝidlovskij kaj ŝestakov, ambaŭ el Moskva. Ĉeestis 200 kongresanoj. Partopreno de TEKA dum la unua kongreso de UEA en Augsburg. Memstaraj kunsidoj kun med. prelegoj: Pérez Domingo, Hispanujo; Chybczynski, docento Rosenberg; W. Robin; Mikolajski.

1911. Ĉesigo de la eldono de ,V. de K.' La tiama TEKA-estraro (prez.

Dor, vicprez. ŝidlovskij, kas. Chybczynski, sekr. Robin) transdonis la redaktadon al Thalwitzer, kiu tiel malavare oferis la 2 TEKA-jarlibrojn. Sed pro transloĝiĝo al Afriko li aperigis nur 2 n-rojn. Nun TEKA eldonis la ĉiudomonatan: ,Oficiala Bulteno de TEKA' sub redaktado de Dor.

1912. La oficiala organo transdonita al Chybczynski, Warszawa, kiu pro materiala sendependeco povis dediĉi sian tempon al la revuo nomata nun ,Kuracisto'.

1913. Aperis la 1-a TEKA Libro: »Estetiko en Medicino«, verkita de H. Swiecicki. La regule aperanta riĉa organo, energio de la estraro (prez. prof. Jameson-Johnson, Dublin, vicprez. prof. Bujwid, Kraków kaj ŝidlovskij, kas. G. Johnston, London, sekr. Weiss, Stuttgart) multe helpis al disvolvo de TEKA.

1914. Redaktado de la gazeto (forlasita pro malsano) transdonita al W. Robin. Nova estraro: prez. prof. Gariel, Paris, vicprez. Bujwid, kas. Alexander, London, sekr. Nemser, Petrograd. Aperis nur 7 monataj n-roj de ,Kuracisto', la milito eksplodis kaj ĉesigis la TEKA-movadon.

1921. Dank' al penadoj de kelkaj fervoraj anoj, recipe de Bischtzky, TEKA estis oficiale restarigata dum la UK en Praha. Prez. fariĝis prof. Vanverts, Lille, vicprez. Bischtzky, Praha kaj Briquet, Lille, kas. s-ino Cass, Preston, sekr. Austerlitz, Bardiouv.

1922. Faka kunveno dum la UK en Helsinki, organizita de Salokannel kaj Lappi.

1923. Ekaperis bulteno TEKA, red. Briquet. Samtempe K. Mezei, Budapeŝt, ekeldonis revuon ,Int Medicina Revuo' (IMR), kiu enhavis referatojn el med. revuoj.

1924. TEKA-kunveno dum la UK en Wien. Raportoj de Austerlitz, Blassberg, Primmer, Sós. Vizito al Lainz kaj al Steinhofa frenceluzoj. Dum la kunsido de Japana Imperia Akademio en Tokio E ricevis unuaniman aprobon, kiel lingvo oficiala por medicino. Dank' al la fervoro de japanaj kuracistoj kaj profesoroj: Nishi, Ogata, Asada, Fujinami ktp. E fariĝis en med. rondoj populara. Med.

gazetoj aperigis diversajn artikolojn en E. Ne unu scienca verko estas publikita en E.

1925. Kontrakto kun Mezei, laŭ kiu li transdonas la gazeton IMR al la TEKA-estraro. Red. estis de nun Briquet, ĉefred. Vanverts. La gazeto aperis regule, kun riĉa enhavo, kaj elvokis ĝeneralan laŭdon. Prez. Blassberg, Kraków, (kiu dediĉis multe da energio al sia ofico), vicprez. prof. Nishi, Tokio (kiu forte kreskigis la movadon en Japanujo) kaj W. Robin, kas. Sós, kaj ĉefsekr. Kempeneers, Bruxelles, (plenuminte sian rolon kun entuziasmo). La red. Briquet donis ekzemplon de modela kaj sistema laboro.

1926. Briquet komencis aldoni al ĉiu n-ro de IMR sian Teknikan Med. Vortaron. Kunveno en Edinburgh dum la UK. Raportis Primmer, Cowdenbeath; Deuel, Leipzig; Meyer, Saarbrücken kaj Kempeneers. Vizito al Reĝa Hospitalo kaj al Universitato.

1927. Sukcesa TEKA-kunveno en Danzig, ĉeestis 60 anoj. Prelegoj de prof. Asada, Nagasaki; Buiwid; Kempeneers; Fels, Lwów.

1928. TEKA-estraro konsistis: Blassberg, Asada, Robin, Bluth, Neuenahr, Kempeneers. Bonega kunsido dum la UK en Antwerpen. Ĉeestis 60 anoj el 13 nacioj. Raportoj de Gunzburg, Antwerpen; Torres y Carreras, Barcelona; Robin; Raupp, Kaiserslautern; f-ino Wolff, Cleve; t-ino Hanbury. Vizito al Zandera Instituto. Fine de la jaro rezignis pri siaj oficoj Blassberg kaj Briquet, red. fariĝis la agema Kempeneers, (ĝis hodiaŭ). Prez. estis elektita W. Robin, vicprez. Buchanan, London, kaj Ogata, Tokio, sekr. Wysokinski, Warszawa, kas. Bluth.

1929. I-a memstara TEKA-konferenco en Wien, preparita de Sós. Raportoj de Friedjung, Wien; Babadagly, Odessa; Adelfang, Warszawa; Črljenjak, Zagreb. Vizito al Instituto pri Historio de Medicino, kie prof. Neuburger legis raporton sciancan. Ekskurso al Kobenzl. Dum la UK en Budapeŝt TEKA-kunsido sub prezido de Mezei.

1930. Fondiĝis Tutsoveta E Med.

Sekcio (TEMS). Estraro: prof. Vojaček, Nadejdin, Gogitidze, Subin, ktp. Estas aranĝataj med. disaŭdiĝoj per Radio Leningrad en E. Fondita »Hemia-Farmacia Sekcio« de TEKA; prez. Witschek, Bratislava; Elwell, London; Maeder, St. Gallen. Areto de TEKA-anoj kolektiĝis dum la UK Oxford.

1931. TEKA-kunveno dum la UK Kraków, granda sukceso. Raportoj de Blassberg; prof. Canuto, Torino; Bulyovszky, Kiskunmajsa; Leono Zamenhof; dir. de UEA Jakob. Ekskurso al Kobiejin-a Frenzelejo. Estraro: Robin, Bluth, Wysokinski, Kempeneers, Canuto, Fels, ktp. Granda prop. por E en la franca med. literaturo. (Le Phare Méd., Bruxelles Méd.), (Courrier Méd.)

1932. TEKA-kunveno dum la UK Paris sub prezido de Vanverts. Vizito al Pasteur-Instituto, Ekskurso al Farmacia Fabriko Roussel. En la revuo »Le Phare Médical« sukcesplena enketo pri E dank' al Cligny. Multaj aŭtoritataj favoraj voĉoj. Apero de la grava verko de Briquet: »Teknika Medicina Vortaro«, 360 p.

W. ROBIN.

Medrkiewicz (mendrkieviĉ) Jan, pol. d-ro med., ĉefkuracisto ĉe asekurkaso de malsanuloj. Nask. 12 nov. 1888 en Lublin. Eltrovis, fotografis kaj precize priskribis bakteriojn de brasika fermentacio. E-istiĝis en sesa klaso ĉe gimnazio de Chranovki en Warszawa en 1906. En la sepa klaso organizis kurson por 40 lernantoj, kiun gvidis A. Grabowski. Sekvan kurson en la gimnazio gvidis li mem. Somere en 1907 organizis unuan kongreson de P E-istoj en Kazimierz, kiun partoprenis ĉ. 40 personoj. Prez. de PEA en Lublin, 1924—29. Gvidanto de Lodza ES de 1929. En 1930 organizis en Lodzo E-istan Sciencopolitikan Sekcion, por agi en registaraj kaj diplomataj rondoj por deviga instruado de E. En 1914 publikigis sciancan verketon kun E resumo. Artikoloj en diversaj gazetoj.

Mees (mes) H. C., nederlandano, kuracisto. Nask. 6 jul. 1865 en Stadskanaal. Red. de »Holanda Pioniro« en 1913—22. Gvidis ekzerubrikon en »Holanda E-isto«. Verkis: »La kaŭ-

zo de la senlaboreco' (1912), kaj libreton por nederlandanoj pri malfacilaĵoj ĉe la traduko. Trad. fragmentojn el „Camera Obscura“ de Hildebrand kaj reviziis la Vortaron N-E de Merkurio.

Megahy (megaj) Basil P., irlandano. Nask. 3 jan. 1854 en County Antrim. Edziĝis kun Marah M. Megahy, anglino, nask. 22 jan. 1855 en Warwick. Ambaŭ E-istiĝis en 1908.

Meier (majer) Ludwig Emil, germano, ekskapitano, verkisto. Partoprenis la militon 1866; vundita. Mortis 1919 en München. Volapükisto. Unu el la unuaj E-istoj en G-ujo, kiu jam en 1889 konatiĝis kun E. La »Nestoro« de la g-lingva E-movado fondis en 1891 la »Societon Esperantistanoj« en München, poste translokiĝinte Nürnbergon, daŭrigis tie sian agadon. En 1903 li intencis fondi tutlandan asocion GES, sed je lia alvoko adresita al 100 konataj de li E-istoj alvenis nur 10 aliĝoj. Verkis lernolibron, 1891 (dua eld. 1903); „E-istan Kantaron“, 1907 (dua eld. 1913); trad. „Wilhelm Tell“ de Schiller, 1906; „Edziĝa festo en Capri“ de Heyse, 1906; Capiro el la „Ama vivo“ de Bölsche, 1906; La monaĥejo de Sendomir de Grillparzer, 1907; „Fabloj de Lessing“, 1921. Kunlaboris al „La E-isto“, „Revuo Int.“ kaj „Danubo“; red. „Münchena E-isto“, apr.-aŭg 1904.

Meijer K. H., nederlandano, stukturisto. Kunfondinto de la unua laborista EG en Hago kaj sekr.-kas. de NFLE (1911—14). Red. ties organon Arbeiter E-ist. Kunlaboris al „Int. Socia Revuo“.

Meisleder (majsleder) Moritz, aŭstro-germano, policinspektoro. Prez. de EG en Linz. Kursoj ĉe la polico kaj fervojo.

Mejdunarodnij Jazik. (Int. lingvo). Monata gazeto en rusa lingvo kaj en E. Fondita en 1925. Formato 26×18. Red. Nikolskij.

Meksiklando, Ameriko. Unuaj pioniroj estis A. Morin (franco) kaj d-ro A. Vargas. Dank' al ilia laboro en 1903 en Santa Rosa Necoxtla (Est. de Veracruz) estis tondata »Sociedad Mexicana Propagadora del E« kaj E-gazeto »La Meksika Lumturo«. 16 jan. 1904 Vargas faris pa-

roladon en ŝtata kolegio en Orizaba, poste eldonitan broŝure. En 1905 aperis EG en Gvanahuato; poste en 1907 alia societo en Gvadalahara, kie A. Gomez Cruz eldonis „E Gazeton“. En Meksikurbo estis fondata »Centra Meksika ES« kaj gazeto Verda Stelo. Ĝi laboris ĝis 1914. En 1918 dank' al agado de ing. Jacinto Beltran, estis fondata societo »E-ista Amikaro«, kiu laboris ĝis 1925. En 1921 aperis la revuo Arguso, eld. de M. C. Rodriguez, kiu gazeto atingis pli longan vivon kaj ĝi estis ankaŭ dissendita prop. cele. En 1926 fondiĝis »E Meksika S«, kiu ĝis nun laboras. Dank' al tiuj societoj estis multaj E-kursoj en diversaj lernejoj kaj ankaŭ en societoj, ekz. »Monda Instituto de Nepersona Vivo«. — La ĉefaj ĵurnaloj volonte helpas al la E-prop. Pere de la du radiostacioj jam estis dissendataj E-kursoj. En la ŝtata teatro kvar fojojn oni prezentis komedietojn pri E kaj koncertojn dum 1927—30. En la lastaj tri jaroj la movado apenaŭ progresis kaŭze de la malfacilaj cirkonstancoj de la E-istoj pro la monda krizo. — La ĉefaj E-istaj prop-istoj estis A. Morin, ing. Luis G. Leon, adv. Ramon Manterola, f-ino Natalia von Schenk kaj ing. J. Beltran (mortintaj); nunaj laborantoj: d-ro A. Vargas, Ernesto Guerra, adv. Fadrigue Fernandez, Angel Luna, M. C. Rodriguez k. a. En ĉiuj ŝtatoj de la lando ekzistas kelkaj E-istoj, sed precipe izoluloj. UEA-del. en kvar urboj. M. C. RODRIGUEZ.

Melckebeke van, belgo, d-ro. Estis L. K. Trad. parton de »Paĝoj el la flandra literaturo«, 1904; »Blinda rozo« de Conscience, 1906. Kunlaboris je »Int. Scienca Revuo«, »Belga Sonorilo«, »La Revuo«, »Espero Katolika«.

Melo e Sousa (melu i soza), brazilano, d-ro, prof. de historio ĉe Lernejo Pedro II, kie li instruas ankaŭ E-n. Iama ĝen. sekr. de BLE, kursgvidanto, reprezentis la registaron ĉe la 6-a UK, kie li ricevis la unuan premion ĉe poezia konkurso. Publikigis plurajn prozaĵojn kaj versaĵojn.

Memortabuloj. v. Stratoj.

Menu de Měníit (mönü dö meni) (Barono) Félicien, franco, konsuto kaj

muzikuloj. Nask. 16 jul. 1860 en Boulogne-sur-Mer, mortis 28 marto 1930 en Neuilly (apud Paris). E-iĝis en 1901. Skribis sennombrajn artikolojn en E en preskaŭ ĉiuj gazetoj E-istaj, kaj fariĝis komitatano de SFPE. Estis dir. de 'Franca E-isto' kaj 'France E-iste', ĉefred. de 'La Revuo'. Li estas precipe konata kiel »la muzikisto de Ek. Li verkis multajn melodiojn kaj kantojn, kaj ĉiuj samideanoj konas lian muzikon de la himno 'Espero', kiu iom post iom oficialiĝis. Krome li verkis: L' Héritage Klodarec, unuakta prop. komedio, 1906. 'Les préjugés contre l'E', 1908. 'Muzika terminaro', 1908. L. K. de 1919.

Menu de Ménéil (Baronino) Sophie Marie-Aline, edzino de la antaŭa, francino. Nask. 10 dec. 1870 en Strasbourg, mortis 22 jul. 1925 en Paris. Sin dediĉis varme al sociaj agadoj. Helpis al sia edzo en liaj E-aj laboroj kaj prop. Zorgis pri Kongresoj, nome pri la UK en 1907, ĉe kiu ŝi faris paroladojn. Multe helpis al la Katolikaj Kongresoj, kaj al starigo de IKUE. Verkis: 'La Morala Edukado de la popola infano' (france kaj E-e), 1907.

Méray (mere) Charles, franco, fama matematikisto. Nask. en 1835 en Chalon-sur-Saône, mortis 2 febr. 1911 en Dijon. Li instruis pri matematiko en la Fakultato en Lyon (1866) kaj en Dijon (1867). Aŭtoro de tute originala traktato pri infinitezimala analizo, elpensinto de nova metodo por instruado de geometrio. Li hazarde eksciis pri E ĉe parolado farita en 1900 de lia kolego Lambert. Lia akra kaj penetrema spirito estis tuj frapita de la genia kreaĵo de Z. Arde li sin jetis en la bataladon multigante paroladojn, gazetajn artikolojn, leterojn, personajn klopodojn por diskonigi E-n en ĉiuj sciencaj rondoj: tiel li gajnis fervorajn adeptojn ne nur en la Dijona Universitato, sed en la Scienca Akademio, en la Pariza Universitato, en la Parizaj liceoj. Li varbis generalon Sebert, kiu jam antaŭe aprobis la ideon, Carlo Bourlet, Laisant, Appell, d-ron Bouchard, dekanon Recoura, rektoron Boirac, prof. Lepine, ktp. Resume li estis la granda propagandisto inter

la scienculoj. En Dijon mem li akiris la aliĝon de la Universitato, urbestro, ktp. En 1901 li fondis kaj prezidis la Dijonan grupon. Samjare, kun Sebert, li prezentis E-n al la Scienca Akademio. Li daŭrigis sian E-agadon ĝis la fino. Kelkaj prop. broŝuroj. L. K., 1905—10.

L. BASTIEN.
Merchant (merĉnt) John, anglo, komerca direktoro. Nask. 12 jul. 1872 en Sheffield. Konsilantarano de YM-CA. Prez. de Reformklubo de S. Kasisto de la fama S. Wednesday Kriketa Klubo. Prez. de SEA dum 14 jaroj. Prez. de EF de Yorkshire, 1921. Prez. de BEA, 1922—31; nun hon. prez. Prez. de ICK de 1928 ĝis 1933. Verkis: 'Tri Anglio Alilande', 1912; 'Jozefo Rhodes kaj la fruaj tagoj de E en Anglujo', 1923; 'Kompatinda Klem', 1931. Entute: grava kaj persista laborado por E.

Merckens Marcel, franco. Nask. 1873, mortis 1911. Estis sekr. de la 'Lingvo Int.', kunverkis F-E vortaron, trad. 'La Vendetta' de Balzac. (UEA, 1927).

Merkado la azenpelisto. Romano de Naum Jeruŝalmi, el ia moderna hebrea trad. Levi Wiener (Leono Vienano). 1933, 140 p. Scenejo en Palestino, tempo: la mondmilito, rakonto: interesa, lingvo: facila. »Historio, kie la kredoj, la familiaj praaj tradicioj, eĉ la superstiĉoj ludas gravan rolon dum ankaŭ intervenas epizodoj de la granda milito en Palestino. Tre agrabla legaĵo.« (G. S. E., 1933, p. 168).

Merrick (merik) William Percy, anglo. Nask. 2 nov. 1868 en Shepperton. Kolektis tradiciaĵojn. E-istiĝis en 1903. Propagandas inter blinduloj. Kas. de la gazeto E-a Ligilo.

Mesny (meni) René, franco, eks-oficiro marista, prof. ĉe la Supera Elektra Lernejo en Paris. Nask. 19 jul. 1874 en Brest. Laboras super teorio kaj aplikadoj de radio; altvalora scienculo, faris i. a. gravajn laborojn pri uzo de radio por determini la pozicion de ŝipo sur maro per mallongaj ondoj. E-iĝis 1902. Provis fondi E-istan Maristan Ligon, 1907. Komitatano de la Pariza Grupo. Prez. la »Radio-Club E-iste de Fr.« Kun-

laboris en 'Int. Scienca Revuo'. Redaktas la E-ajn resumojn en la »Bulletin de la Société Française des Electriciens.«

Mestán (meŝtan) Franz de Paula, aŭstriaano, pastro, dum 18 jaroj provincale de l' ordeno de piaristoj por Aŭstrujo, konsistoria konsilisto en Krems. Nask. 1 apr. 1865 en Hlinsko (nun ĈSR). Multe laboris en la E-movado. Estis prez. de IKUE kaj Kat. Unuiĝo E, Wien, vicprez. de AED, komisaró de ŝta'a Ekzamen komisiono de E, Wien. Li verkis »Tabeloj por intua instruado de E', aprobitaj de l' ministerio por instruaferoj, krome »E-preĝareto', multe uzata.

Metropoliteno. Romano, originale de V. V a r a n k i n. 1933, 209 p. »Temas pri juna soveta inĝeniero, kiu vojaĝas al Berlino por studi la metodojn de konstruo de metropoliteno (subtera elektra fervojo)... La moderna vivo en Sovetio speguliĝas flanke de la antaŭ-Hitlera Germanujo.« (F. E. W., »The British E-ist,« nov. 1934.)

Meyer (mejer) Samuel, franco, interpretisto kaj ŝipa makleristo. Nask. 8 febr. 1864 en La Rochelle, mortis 16 majo 1921 en L. R. E-iĝis en 1899, kaj tuj gvidis kurson en L. R. kaj faris paroladojn. Dum multaj jaroj kunlaboris en »L' Espérantiste', batalis flanke de Beaufront, kaj poste penadis por deteni lin de la ida skismo. Komitatano de SFPE, prez. de la Sudokcidenta Federacio. Li scipovis dekuon da lingvoj; lia stilo estis tre pura. Krom multaj artikoloj kaj prop. broŝuro li postlasis multajn valorajn tradukojn: X. de Maistre: »Vojaĝo interne de mia ĉambro', 1904. Molière: »L' Avarulo', 1904. Beaumarchais: »La Barburo de Sevilla', 1909. De Hervilly: »La Supujo', komedioto, 1909. Mérimée: »Karmen', 1911. C. Wagner: »Estu Homo, 1912. De Vigny: »La Intervidiĝo kaj Nekonita Dialogo', 1914. L. K. de 1905. L. BASTIEN.

Mezei Károly, hungaro, d-ro, kuracisto. Nask. 16 febr. 1890 en Budapeŝt. Verkis 4 librojn kaj proks. 200 artikolojn pri kozmetiko. Eltrovinto de la »Chromolux-terapio«. E-isto de 1905, fervora propagandisto antaŭ la milito. En 1919 verkis lernolibron,

poste fondis kaj en 1923-25 redaktis »Int. Med. Revuon'.

Mezopotamio, v. Irak.

Mia penso. Poemo de Z, verkita antaŭ 1887. »Dum ses jaroj li restadis sub silento. Ĝi estis tempo malfacila. Al neniu li parolis pri sia laborado... Tiel pasis for la plej belaj jaroj de la vivo, la studentaj, malgaje kaj dolore.« (Privat, Vivo de Z, p: 32.)

Mia poezio. Originale de San Millan Alonso. 1932, 62 p. »Laboro zorga, honesta, obeanta regulojn de versfarado, ... iom didaktika kaj ne tre altfluga.« (G. S., »E', 1932, p: 105.)

Michaux (miŝo) Alfred, franco, advokato. Nask. 5 jul. 1859 en Clenleu (apud Boulogne-sur-Mer). Advokatestro en B. Tre agema, prezidis societon por infanoj laŭleĝe punindaj; okupiĝas pri sportoj, ktp. Li studis kaj povis paroli la »Neo-Latin« de Courtonne. Li estis varbita al E de Beaufront. La unua kongreso en Boulogne dum 1905 restos lia gloro. Li iniciatis, preparis kaj sukcesigis ĝin. La 7 aŭg. okazis en Calais kunveno de 120 E-istoj. Kelkaj proponis, ke tian feston oni rekomencu en la venontaj jaroj. Tiam M. ekkriis: »Nu, mi invitas vin la venontan jaron en Boulogne por vera, grava E-ista Kongreso«. Tiu historia frazo estas la fonto de niaj UK-j. Dum la unua UK li gastigis Z; lia praktika senco kuraĝigis la Majstron kaj efike helpis al la granda sukceso kaj al la decidoj alprenitaj. M. viciĝas inter la plej varmaj kaj agemaj propagandistoj de tiu epoko. Li faris sennombrajn paroladojn en Francujo kaj ankaŭ en Belgujo, Nederlando, Britujo. Li prezidas la Societon Int. de juristoj E-istaj. Li opiniis, ke en kelkaj medioj (ekz. kuracistoj) oni ne povas sukcesigi alian lingvon ol la latinan, kaj li proponis utiligi latinon simpligitan »Romanal«. Tiu provo ne havis sukceson. Krom multaj artikoloj en francaj ĵurnaloj li verkis: Kun Boulet: »Nouvelle méthode pour apprendre seul l' E', 1905. »Libera Evolucio aŭ Akademio', 1908. »Catéchisme de l' E'.

L. BASTIEN.

Micuŝi Icumu, japano. Oficisto de fervoja ministerio. Nask. 3 jun. 1896 en Sizuoka-ken. Direktoro-kasisto de JEL

Sindoneme kaj sukcese administras ekonomian flankon de JEI preskai de la fondo.

Midthus Haldor, norvego, instruisto, en Lysekloster ĉe Bergen. Mortis 31 marto 1909. Studis Volapükon antaŭ 1900; en tiu jaro konatiĝis kun E., rapide ellernis ĝin kaj poste fervore propagandis precipe inter geinstruistoj. L. K. de 1905. Preparis lernolibron — ne eldonitan — kaj kunverkis la lernolibron de la dana pioniro F. Skeel Giörling.

Mi en li. Romano de L. Vladyka, el la ĉefa trad. Moraviaj E-Pioniroj. 1933, 193 p. »Mistere malkvietiga romano... la eventoj arte kaj komlike interplektiĝas... la stilo streĉe konciza... ofta senpera dialoga formo... lerte tradukita.« (G. S., E', 1934, p: 5.) »Verko apenaŭ komprenebla kaj certe ne tradukinda.« (The B. E. 1933. 163. p.)

Migliorini (mijorini) Bruno, italo, d-ro, lektoro, poste priv. docento kaj komisiita prof. pri itala lingvo en Roma Univ. Ĉefredaktoro de granda Itala Enciklopedio. Nask. 19 nov. 1896 en Rovigo. E-isto de 1912. Fondis grupon en Rovigo (1912), kunfondis en Venezia (1914) kaj en Roma (1921). Verkis E gramatikon por italoj (2 eld.), int. E-an Legolibron (kunlabore kun sia frato Elio M.); verkis artikolojn pri lingvaj temoj en diversaj gazetoj (pri ĝenerala lingvistiko, pri E-vortoj, kontraŭ aliaj projektoj de int. lingvo). Prelegis en Someraj Universitatoj de Oxford (1930) kaj Paris (1932).

Migliorini Elio, italo, d-ro, helpanto ĉe Geografia Instituto de Roma Univ. Nask. 9 marto 1902 en Rovigo. Kunlaboris en italaj E-gazetoj. Del. de UEA en Roma de 1922.

Migranta Plumo. Verkis Baghy, 1929, 158 p. »Poemoj kun prozoj, originalaĵoj kun tradukaĵoj alternas multkolora. La majstra formosento de Baghy ĉiam nove surprizas. Ĉiu poemo estas kvazaŭ muzikaĵo. La kutima interesa rakontmaniero, la bela, eleganta stilo kaj esprimriĉeco ne mankas ankaŭ ĉe ĉi tiuj rakontoj.« (Rózszi Göndör, Hungara Heroldo, 1930, n-ro 1.)

Migrunkunmi. Katolika preĝlibro por

viroj kaj junuloj. De J. Sauren. 1913, 336 p.

Mihalik József, hungaro, prof. de instruistina seminario. Nask. 27 aŭg. 1883 en Kassa. (nun Košice, en ĈSR). Longajn jarojn militkaptito en Siberio, kie li konatiĝis kun la lingvo. Propagandas E-n ĉe oficialaj personoj kaj en pedagogiaj rondoj. De 1928 li gvidis la aferojn de HES kaj en 1931-32 estis ĝia prez. En 1932 fondis la H. E.-Pedagogian Asocion. La ĉefa organizanto kaj prez. de UK en Budapeŝt. En la UK en Oxford kaj Kraków reprezentis la ministron de la instruado. En 1930 aperis lia hungarlingva broŝuro. Red. de 'H. Heroldo' en 1931-32.

Miĥalski Eŭgeno, (ps.-j Torentano, Revulo, Profetivski), ruso, instruistobibliotekisto. Nask. 21 jan. 1897 en Letičev, Ukrainio. E-isto de 1911. Nun organiza sekr. de la IAREV. En 1917 li fondis lit. E-revuon 'Libera Torento' en Saratov, kie aperis liaj unuaj poemoj originalaj kaj tradukaĵoj. Kunlaboris al 'SAT-organoj', 'Bulteno de SEU', 'Internaciisto' kaj al 'La Nova Etapo'. Aperis de li poemoj, 'La Unua Ondo', 1918, 'Du Poemoj', 1922, 'Prologo', 1929, 'Fajro kuracas', 1932. Flirtvoĉa poeto. Majstro de la liberaj formoj. Liajn poemojn karakterizas la rapsodieca ritmokonstruo. La ĉeftemo en liaj unuaj tri libretoj estas la nudigita amo. En 'Prologo' jam troviĝas socialistaj pensoj, sed en 'Fajro kuracas' li tute forĵetis sian ĝistiaman ĉeftemon kaj grandspire kantas pri mondpolitikaj aktualaĵoj laŭ ekstreme maldekstra revolucia koncepto piedpremante la demokration. Cetere liaj poemoj estas belaj, variaj kaj surportas la aromon de ia stranga poezia ĉarmo. EMBA.

Mijake Hisano, japano. Nask. 1905 en Okayama. Laboristino, iam ĉe la presejo de la eldonaĵoj de JEI. Kuraĝa agitparoladantino en E. — (Kaw.)

Mijake Ŝihej, japano. De marto 1932 ekskluzive oficas kiel sekr. de JEI. Nask. 16 okt. 1901 en Simaneken. Iniciatis J. E-Literaturan Societon en 1932, kiu celas plibonigon de stilo de J. verkistoj kaj elekton de J. tradukindaj verkoj. Trad.: 'Epizodo en

Suzenji', historia dramo de nuntempa verkisto. Red. »E-Lernanto«. 1933.

Mikkelsen Asta, danino, instr. en Kopenhago. Nask. 23 marto 1869 en Logtved. Prez. de E-Unuiĝo de Danaj Instruistoj, fondita 20 nov. 1911.

Mikolajski Stefan, polo, d-ro, kuracisto kaj ĵurnalisto. Nask. 1861 en Kraków, mortis 27 nov. 1929 en Lwów. Red. dum multaj jaroj la polan revuon »Voĉo de Kuracistoj«, verkis multajn profesiajn scienc-verkojn. Kiel E-isto li famiĝis, ke li, la unua, eldonis profesion E-an revuon, »Voĉo de Kuracistoj«, 1908-11. Estis kunprez. de la UK en Kraków, 1912.

Milano kaj lagoj de Lombardio, eld. Touring Club Italiano, 1931, 112 p. kun 9 kartoj kaj 6 planoj. Grava eldonaĵo, kiu informas la turistojn laŭ la modelo de 'Baedeker'.

Mildwurf Adolf, pollandano, d-ro de politikaj sciencoj, ĵurnalisto. Nask. 1900 en Przemyśl. E-isto de 1916. Aranĝis studentan fakunvenon dum la UK 1924 en Wien. Multaj paroladoj en W. Kiel Ĉe-metoda instruisto gvidis en 1933 multajn kursojn en Danujo; fondis tie tri grupojn. Kunlaboranto de HDE.

Miletz (milee) József, hungaro poŝtŝparkasa oficisto. Nask. 18 dec. 1865 en Órkény, mortis 20 aŭg. 1915 en Kispest. Finstudis kvin jarojn de la med. fakultato. Pioniro, la unua aktiva E-isto en Budapeŝt. Fond. kaj prez. de la unua EG en la ĉefurbo, 1901. En 1903 verkis kun Lengyel kaj Schwörrer gramatikon, en 1904 red. la gazeton »E« kaj en 1905 »Hungara E'. Prop. laboro ankaŭ en Kispest.

Milita periodo. »3700 E-istoj enskribiĝis por la Deko UK en Parizo en 1914, inter ili 2500 eksterlandanoj. Giganta palaco Gaumont estis luita kaj ornamita per verdaj flagoj. La salutparolo de s-ro Painlevé estis preta. La organizo estis modele preparita.

Karavanoj de Rusoj, Germanoj, Angloj jam forvojaĝis, kiam eksplodis la eŭropa milito. Alveninte Parizon la 1-an de aŭg., la fremdaj E-istoj vidis ekscitajn popolamasojn, ĝeneralan mobilizon, ŝirajn adiaŭojn de patrinoj kaj edzinoj al forirantaj virtoj. La karavanoj reprenis mem la

vagonarojn en granda urĝo. Sed ne ĉiuj povis. Kelkaj malfeliĉaj fremduloj estis internitaj en civilkaptitejoj. La ceteraj haltiĝis survoje aŭ revenis hejmen, multaj por forveturi sia-vice al la batalkampoj.

D-ro Z, haltigita en Köln, rapidis al rusa landlimo, trovis ĝin fermita, reveturis Berlinon kaj devis entrepreni la longan vojaĝon tra Svedujo-Finnlando-Peterburgo por reatingi la hejmon en Varsovio. Sovaĝa kanonado kaj malamaj kantoj eksonis anstataŭ la espera himno. Diplomataj intrigoj, kaj imperialistaj ambicioj jetis tutan Eŭropon en ĥaosan buĉadon. Malhela ondegno dronigis la noblan revon de la E-istoj sub frakasa ŝaŭmo.

Dum monatoj oni sciis nenion unu pri aliaj. Tamen la flameto ne estingiĝis. En savita teranguleto, meze de Ĵ ventego, la UEA-oficejo restis malfermita en neŭtrala Svislando. Post ses monatoj da silento la gazeto »E' reaperis en jan. 1915. Hodler donis novaĵojn. Li estis organizinta servon por transsendo de familiaj korespondadoj inter malamikaj landoj. Kompreneble politika aŭ militista aludo estis severe malpermesita. Leteroj devis alveni malfermite al UEA en Genève, kiu transsendis ilin al la dezirata lando kun eventuala traduko en ties lingvon laŭ neceso. Franca patrino skribis al filo en Germanujo. Aŭstria knabino al fianĉo en Anglujo. Kortuŝaj korespondadoj, homaj amoj, doloroj, mizeroj, esperoj trapasis la UEA-oficejon, kie multaj lokaj gesamideanoj helpis. Du aŭ tricent leteroj alvenis kaj resendigiĝis ĉiutage. Tiamaniere ioman helpon en homaj suferoj povis alporti E kaj ĝia organizo. La faritaj servoj atingis 200.000

Sed Hodler faris pli. Per sia gazeto li memorigis la E-istojn, ke ili estas homoj. »Ni havas la devon ne forgesi«, li skribis en nobla artikolo »Super« (»E', 5 jan. 1915). »Flanke de niaj simpatioj, ni havas deojn, kiujn al ni trudas nia E-isteco . . . devo kredi, ke neniu popolo havas la monopolon de la civilizeco, de la kulturo aŭ de la humaneco . . . Devo kredi, ke neniu popolo entute havas la monopolon de la barbareco, perfideco aŭ stulteco . . . Devo konservi

prudenton eĉ meze de la premigaj influoj de la popolamasoj. . . La parolo estas nun al la kanono, sed ne eterne daŭros ĝia blekado. Kiam cent-miloj da homoj kuŝos en la batal-tomboj kaj la ruinoj eĉ la venkintoj kaj venkitoj atestos pri la teknikaj pli ol pri la moralaj progresoj de nia civilizeco, tiam oni alvenos al iu solvo, kaj tiam, malgraŭ ĉio, la int. rilatoj denove ligiĝos, ĉar super la nacioj estas tamen io. . . Se sur la nunaj ruinoj ni volas konstrui novan domon, oni bezonos tiujn laboristojn, kiujn ne timigos la malfacilaĵoj de la rekonstruado. . . Ni E-istoj estu la embrio de tiuj elitoj. Por inde plenumi nian taskon, ni konservu nian idealon per ne lasu nin subpremi de la malespero aŭ de bedaŭro. »

El ambaŭflankaj tranĉeoj venis al Hodler emociaj aproboj de homoj kunsentantaj apud la morto kaj danĝero. Ho ve, la listoj de »Niaj mortintoj« pli kaj pli longiĝis. Ankaŭ la milito mem. Tamen la kroniko montris, ke la movado ne mortis. En aliaj kontinentoj ĝi daŭris ageme, en Brazilo, en Usono, en Australio, en Ekstrem-Oriento. En aŭg. 1915 eĉ okazis en San Francisko la Dekunua kongreso, kompreneble pli amerika ol universala. El Eŭropo partoprenis neniu delegito krom rusa vojaĝanto, sed kelkcentoj da E-istoj el Kanado kaj Usono tie kunvenis dum la Pacifika Ekspozicio. Ĉefe temis pri: Kiel organizi la fortojn de la E-istaro post la fino de la eŭropa milito? La kongreso voĉdonis deziresprimon, ke UEA tion entreprenu sin turnante al ĉiuj naciaj societoj el sia sidejo en ekstermilita Svislando. En Eŭropo estis kursoj en preskaŭ ĉiuj landoj, neŭtralaj kaj militantaj, sed kompreneble malpli multaj ol antaŭe. Kiam la gazeto „E“ ne povis plu eniri aŭ trapasi kelkajn landojn, Hodler presigis raportojn de UEA, kiujn li dissendis en formo de broŝuretoj kun novaĵoj pri ĉiuj naciaj movadoj.

En kelkaj landoj, i. a. en Germanujo kaj Francujo, aperis militaj propagandiloj en E pravigantaj la nacian vidpunkton. Kelkfoje registara subteno, aliffoje privataj iniciatoj tion ebligis.

Pli interesa estis la disvastigo de vera E-ismo en la militkaptitejoj. Kiam s-ro Justin Godard, honora membro de UEA en Lyon, estis ŝtata subsekretario de la saneca fako en 1916, li cirkulere rekomendis al la militistaj flegistoj la lernon de E kaj mendis por disdono 10.000 e-rojn de la lernlibreto Bayol E-Ruĝa Kruco. Aliflanke la Tutmonda Komitato de YMCA disdonigis milojn da E-lernolibretoj al militkaptitoj en diversaj landoj.

Tiuj malfeliĉaj junuloj, enfermitaj kiel brutaro inter bariloj, sopiris je ia interesa allogaĵo, kiu forgesigas malsaton kaj hejmosopiron. Hodler rekomendis al delegitoj de UEA viziti tiujn lokojn se permeso ebligas kaj vidi ĉu ne troviĝas iu perdita samideano. En diversaj lokoj ili faris tion kaj ĝoja interfratiĝo okazis. En aliaj tiaj malliberejoj, unu sola kaptito instruis la lingvon al centoj da ceteraj, kiuj kopiis vortojn kaj regulojn unuj de aliaj. Tio i. a. okazis en Siberio, kie japanaj generaloj eĉ subtenis tiun lernadon. E-istaj rondoj fondiĝis. Oni kantis la himnon kaj ŝaje interparolis la lingvon inter plej-diversgentanoj.

En tia perdita malproksima loko, la hungara poeto Julio Baghy verkis iujn el siaj plej belaj poemoj. Tie atingis lin la malĝojiga novaĵo pri la morto de d-ro Z pro kormalsano (14 apr. 1917):

La famon ne brue,
Nur poste malfrue,
Simile al eĥo de mortkrio
Mallonga sciigo alportis:
»La Majstro mortis«.

Tiu mallonga sciigo trafis iam kaj plorigis homojn en ĉiuj plej malproksimaj anguloj de la mondo. Jam delonge ili aŭdis nenion pri la movado. Ĉu ĝi vivas ankoraŭ? Ĉu ne? Ĉu dronis ankaŭ tiu nobla espero de l' homaro sub la malhelaj ondegoj de l' buĉa teruro? Jen mortis la tondinto, la inspiranto de miloj. Kio estos post li? Ĉu homa verko disbloviĝos al ĉiuj ventoj de fergeso, aŭ ĉu la spirito lasos ian subteran semon potencon je eterna vivo kaj iam refloronta konsole tra la mondo mizera? »

Ĉapitro, prenita el la 'Historio de la lingvo E', de E. PRIVAT.

Militrezista movado. Dum la milito izoluloj diverslande rifuzis ĝin partopreni iel ajn, bazante sian rifuzon sur motivoj aŭ religiaj aŭ moralaj. En Anglujo starigis la »No-Conscription Fellowship«, kies membroj kuniĝis por rezisti la milit-servon. En Britujo 16.000 malliberiĝis pro tiu rifuzo. En 1921 diversnaciaj militrezistantoj starigis la Internacian de Kontraŭmilitistoj (»War Resisters' International«) religie kaj politike neŭtralan. Ĝiaj membroj unuiĝas en la konvinko, ke ĉia milito estas krimo, kaj ili firme rifuzas subteni ian ajn militon, kaj penadas forigi ĉiajn kaŭzojn de la milito. Ili kredas, ke la plej bona metodo forigi la militon, estas rifuzi ĝin partopreni. De la komenco la I. K. uzadis E-n, kaj eldonis broŝurojn kaj modele redaktatan regule aperantan informbulletonon en E. Pere de E la I. K. enradikiĝis en multaj landoj, kie sen ĝia helpo kontakto ne estus ebla. La Homaranismo de Z havas parencecon al la idealoj de I. K. Pro tio I. K. atendas kaj efektive trovas multe da helpo ĉe la E-istaro. La sekr. de I. K. estas H. Runham Brown, 11 Abbey Rd., Enfield, Middlesex, Anglujo. I. K. havas 48 sekciojn en 27 landoj, kaj individuajn membrojn en 64 landoj. En fino de 1932 pli ol 100 junuloj diverslande estis en malliberejo pro rifuzo de milita servo. I. K. multe helpas al tiuj, kiuj tiamaniere suferas por la paco de la homaro. M. C. BUTLER.

Milidge (miliĝ) Edward Alfred, anglo, komercisto. Nask. 13 jul. 1865 en Kingston on Thames. E-isto de nov. 1903. Cestis de 1905 ĝis 1911 la UK-jn en Boulogne, Genève, Cambridge, Dresden, Barcelono, Antwerpen. Redaktis kun kaj sen W. W. Mann kaj A. E. Wackrill 'The British E-ist'. Verkis multajn artikolojn. Kompilis 'E-A Vortaron' (1932, V-a eldono), kaj kun G. E. Gordon indokson al ia sama vortaro. LK kaj multajn jarojn estis ankaŭ akademiانو.

Milsom Maria, (ps. Ramo), francino. Mortis 82-jara en Bossey 14 aŭg. 1933. Pioniro de E en katolikaj ron-

doj. En Genève ŝi aktive kunhelpis kaj mone subtenis la movadon. Trad. la faman romanon de Wiseman: 'Fabiola', 1914, 'En Svislando' 1908, 'Eĉ en doloro ni estu ĝojaj' de Kamm, 1910 ktp.

Mincev (minĉev) Dimitr Nikolov, bulgaro, publicisto. Nask. 18 jun. 1905 en Constanta. (Rumanujo). Red. de rumana lit. revuo, kunlaboranto de rumana literaturo, batalanto por la bulgara-rumana kultura amikeco. E-isto de 1928. Grandnombraj artikoloj por E. Fondinto kaj red. de la trimonata gazeto 'E-istul', 1932. Prop broŝuro, 1929. Prez. de EG.

Miniaturaj. 50 originalaj poemoj de G. D. Nash. 1931, 58 p. »Nash sternas mozaikojn ĉie kolektitajn; ili iĝis versoj sub lia mano, kiun estras saĝo, mildo, ĉionkompreno, amo al ĉiu subsuna kreaĵo kaj senlima bonkoreco. Lia lingvaĵo estas pure poezia, belforma kaj formrica.« (Butin, HDE, 1931, n-ro 45.) »Ĉarmaj poemoj, sed kun ĉieaj adasismoj, tro oftaj gramatikaj eraroj kaj aliaj makuloj, kiuj povas neniigi eĉ la plej allogan ĉarmon.« (Newell, The B. E. 1931 p. 109.)

Minibek (minibek) Arnold, aŭstro-germano, d-ro, jura kaj fil., komercministeria konsilanto. Nask. 15 jul. 1878 en Lienz, Tirol, mortis 17 jul. 1930 en Wien. Prez. de la 16-a UK en Wien, 1924.

Minke Jan Willem, nederlandano. Nask. 5 jun. 1896 en Amsterdam. E-isto de nov. 1926. Estrano de »Ni volas Lumon« de 1927-1932. Regiona SAT-paranto, 1931-33. Kunaŭtoro de E-lernolibro.

Minkov Stefan, bulgaro, prof. de mekanika-elektroteknika lernejo en Sofia. Nask. 23 majo 1883 en Razgrad. Fakulo en la metala tekniko; gravaj verkoj, multaj artikoloj. Jam en 1906 li ricevis ateston pri kapableco de SFPE, Francujo, kie li perfektigis kiel mekanikisto 5-6 jarojn, samtempe vigle partoprenis la E-movadon kaj spertis ofte la praktikan utilon de E. Ano de BEA, Bulgarujo, de 1912, ĝia sekr. dum la mondmilito kaj kunred. de 'B. E-isto', nun estas vicprez. Ano de UEA de 1915, nun ĝia komitatano. Gvidis kursojn.

Minnaia Luigi, italo, ŝtatoficisto. Nask. 21 jan. 1899 en Pisticci. E-isto de 1926. Fervora prop-isto. Sekr. de la loka grupo en Roma.

Minoda Takuma, japano, komercisto de konstrua maŝinaro. Nask. 1 sept. 1875 apud Sendai. Unu el la dir. de JEI. Kompilis: »Japanaj Komercaĵoj,« 1911

Minor Karl, anglo, loĝanta en Germanujo, reklamisto kaj eldonisto en Hamburg. Nask. 21 septembro 1891 en London. Konatiĝis kun E en 1908, aktivigis en la movado en 1921, fariĝis literatura red. de ‚G. E-isto‘, kie li ankoraŭ nun estas recenzisto de novaj verkoj. L. K. Prez. de ES. Verkis: ‚E-G Vortaron‘, 1924; trad. ‚Natan la Saĝulo‘, dramo de Lessing, por la fest prezentado ĉe la UK en Nürnberg, 1923.

Mirejo. De Mistral, tri kantoj unuaj, el la franca trad. Champion kaj Noël. 1909, 72 p. Ĉefverko skribita en unu el plej malnovaj kaj samtempe plej ĉarmaj lingvoj de Eŭropo. (El la Antaŭparolo.) Bona traduko.

Mirinda Amo. Romano, originale de Luyken. 1913. 295 p. Interesa enhavo kun morala subtendenco. Bona stilo. Verko kronita de la Akademio.

Mirski Boris, (ps. Bela Manto) Mortis dum la milito. Estis talenta E-poeto kaj trad. el Lermontov.

Misiistoj. v. Katolika movado.

Miss Esperanto. Dum la UK en Budapeŝt, 1929, okazis beleckonkurso en la kadro de la kostumbalo. Partoprenis ĉ. 100 fraŭlinoj el multaj landoj. Tiun ĉi titolon de la plej bela fraŭlino ricevis Veronika Ekstá, estona oficistino.

Mistero de doloro. Dramo el la kampara vivo en 3 aktoj de Gual, el la kataluna trad. Pujula y Valles, Kolekto de ‚La Revuo‘. 1909, 92 p. »Bela kaj interesa dramo, ludota de profesiaj aktoroj dum la Barcelona Kongreso. Generale bona estas la traduko«. (P. C. — Th. C., L. I. 1909, p: 380.)

Mistler Alphonse, franco, instr. Nask. 5 febr. 1873 en Tannenkirch, Alsace-Lorraine, Francujo. En sia patrujo li komprenis E-an gramatikon en 2 horoj. 1893 venis al Nagasaki, Japanujo, kaj restis tie ĝis 1933.

1902 skribis pri E en iu fremdlingva gazeto en Nagasaki, unua voĉo pri E en J-ujo. De 1903 instruisto de fiziko, kemio en Kaisei Tyŭgaku, kie iam lekcis E-n. Nun instruas francan lingvon en St. Joseph's College, Bluff, Yokohama. Milda, nesintrudema, serioza. — (Kaw.)

Misima Miĉiaki, japano, vicgrafo, membro de Supera Domo de Parlamento, dir. de J-a Ligo de skoltaj grupoj. Nask. 1 jan. 1897 en Tōkyō. Konsilanto de JEI. — (Kuw.)

Mittey (mite) Alfred, franco, literpentristo. Nask. 26 nov. 1873 en Parizo. Interesiĝas pri sindikataj aferoj kaj interhelpaj societoj. Propagandisto de E, dum 8 jaroj gvidis kursojn en la Pariza Laborborso. En jan. 1931 kreis la ĉiulundan tagmanĝon »Agapo« en Parizo, kunvenejon de multaj E-istoj.

Mladenov Stefan, d-ro, bulgaro, univ. prof. de kompara lingvistiko. Amiko de la int. lingva movado, speciale de E kaj skribis artikolojn pri ĝi.

Möbusz Albin Friedrich Richard, d-ro, (ps. Amo), germano, dir. de realernejo. Nask. 8 jan. 1871. Iam volapükisto. E-isto de 1901. Faris multajn prop. paroladojn, gvidis multajn kursojn, fondis grupojn en Lübeck, Flensburg, Schleswig, Kiel, Eutin. Estis dua prez. de GEA, 1909—12, prez. de Nordalbinga EL, 1912—21, prez. de la Lübeck-a ES de 1908 ĝis nun. Verkoj: ‚E lernolibro por G-oj‘, (5-a eld. 1924); ‚Universala E-Lernolibro‘, 1926; ‚E-aj Instruletoj‘, 1918—20; ‚Demonstraciaj tabeloj‘, 1912; ‚Dokumentoj de E‘ 1921; ‚Katalogo de E sigelmorkoj‘, 1912. Multaj artikoloj en kaj pri E en gazetoj.

Moch (mok) Gaston, franco, oficiro de artilerio, ĝis 1894, poste verkisto. Nask. 6 marto 1859 en Saint-Cyr (apud Paris). En 1893 li verkis francan libron, kie li antaŭvidis ne mallongan, sed kvarjaran militon, kiu unuigos la batalantajn popolojn. En 1894 li eksciĝis kaj sin dediĉis al la propagando de paco per franca-germana akordo, kaj al la defendo de la »Rajtoj de la homo«. En 1879, lernanto en »l' Ecole Polytechnique«, li legis libron pri Leibnitz kaj de tiu mo-

mento ne ĉesis pripensi la problemon de int. kompreniĝo, tiom pli ke li estas poligloto. Li aliĝis al E en 1889 (la tria aliĝinto en Francujo), kaj dum multaj jaroj propagandis per parolo kaj verkoj. La 31 marto 1900 li faris paroladon, post kiu fondiĝis la Pariza grupo, kiun li prezidis. Sed tuj ĉe la komenco li deziris perfektigojn kaj korektojn, kaj, post la rifuzo de Z, li daŭrigis sian porreforman agadon. »al kiu, li diras, li fine altiris de Beaufront, unue timigitan«. Li partoprenis en la laboro de la Delegacio (1907) kiel anstataŭanto de Boirac. Iom post iom li deturnis sin de E, kaj kiam la komisiono elektita de la Delegacio finis sian laboron (1913), li definitive adoptis la reformitan sistemon. Nun li rejetas eĉ la ideon de artefarita lingvo. Li redaktis 'Espero Pacifista' (1905—1908). Krom multaj artikoloj kaj kelkaj broŝuroj en E precepte pri paco kaj malarmo, li verkis:

'La question de la langue int. et sa solution par l' E', 1897. 'Pri la elparolado de E', 1907. Traduko de Tristan Bernard: 'Angla Lingvo sen profesoro', komedieto, 1907. Traduko de About: 'La Reĝo de la Montoj', 1909. 'Pri la transskribo de la propraj nomoj en E', 1910. LK, 1905—12.

L. BASTIEN.

Moder Hans, germano ĉeĥoslovaka. Longjara sekr. de la EU »Verda Stelo« en Praha. Instr. por E en blindulejo. Verkis en E aron da humoraj skizoj.

Modernaj Robinzonoj. En la Siberia Praarbaro. Rakonto, originale de T. Sch w a r t z, (Budapest). 1924, 88 p. Vivo, suferado, forkuro de militkaptitoj tra multaj aventuroj. Simpla, vigla stilo.

Modrjan Fr., jugoslavo, prof. Gvidanto de Isosek-kursoj. Verkis la libron 'Fabeloj', originalaj; tradukis slovenajn beletristikajojn.

Moissenet (müasne) Léon, (ps. L. M.), franco, ĉefiĝn. de la ŝtataj Pontoj kaj Vojoj. Nask. 3 majo 1860 en Paris. Fondis aŭ prezidis diversajn grupojn. Membro de la patrolanda Komitato de SFPE. Krom artikoloj en lokaj gazetoj kaj en 'Int. Scienca Revuo', propagandis precipe sam-

profesiuloj kaj politeknikanoj. Sendis komunikojn pri E-a movado en la grava revuo 'France et Monde', ktp. Sendis al la Komitato Morris (Usono) verkon pri 'E helpa lingvo je praktika uzado'.

Mojado Mariano, hispano, pastro en Madrid. Prez. de HEI. Faris multajn radioparoladojn pri E. Kunlaboris al 'H. E-isto'. LK.

MOKA, Mondjunularo Katolika.

Unua alvoko por la fondo de MOKA aperis en 1919 en la E-gazeto, 'Blanka Kruco', definitiva fondo okazis en 1920 en Hago. En la unuaj jaroj ĝi laboris kiel sekcio de IKA (v.), sed kun organiza sendependeco. Kongresoj de MOKA okazis en 1921 en Graz, 1922 en Lüksembourg, 1923 en Konstanz, 1924 en Lugano, 1925 en Oxford, 1929 en Barcelona, int. specialaj konferencoj en diversaj lokoj. En multaj int. kongresoj organizitaj de aliaj asocioj MOKA kunlaboris. Ĝiaj organoj estis la gazetoj 'Blanka Kruco', 'Espero Katolika', 'Katolika Mondo', 'Junula Angulo' en 'K. M.', fine de 1926 ĝia propra gazeto 'La Juna Batalanto'. Aperis kaj aperas kelkaj naciaj informiloj, ĉiuj kun insista E-propagando. MOKA organizis int. korespond-, inform-, vojaĝservojn, ktp., helpis efike la E-propagadon. Ekz. en 1927 MOKA publikigis alvokon »Katolika junularo kaj E«, subskribitan de pli ol 30 kat. junularaj asocioj. La alvoko estis represata en 20 gazetoj, speciala flugfolio (12000 e-roj) ankaŭ disvastigis ĝin. MOKA eldonis flugfoliojn por E en franca, angla, fina kaj aliaj lingvoj. La ĉefsekr. de MOKA faris paroladojn kun etika E-propagando en 20 eŭropaj kaj amerikaj landoj, kelkaj naciaj sekretarioj estas tre fervoraj propiŝtoj. La organizo estas jena: Ekzistas delegitoj kaj lokaj grupoj, naciaj sekr-oj kaj naciaj komitatoj, fine int. komitato, ekzekutiva komitato kaj int. sekr-ejo. Protektoro estas episkopo d-ro Majláth de Transilvanio, Rumanujo. La MOKA-movado estas benita de la papo kaj de multaj episkopoj. La int. sekr-ejo estas en daŭra kontakto kun membroj kaj simpatiantoj en tre multaj landoj, naciaj sekr-ejoj nun laboras en 23 landoj.

Adreso de la int. sekr-ejo: d-ro W. Solzbacher, 77 Montée de Pilate, Luxembourg-Eich, Luks.

W. SOLZBACHER.

Mölke Marta (Sophie), germanino, sekr. de kunlaborado de IALA. Nask. 20 apr. 1886 en Sommerfeld. De 1927 laboras por E: prop. artikloj kaj paroladoj, starigo de statistikoj kaj adresaroj rilate la instruistaron kaj instruadon de E. Artikoloj en IPR.

Monako, Eŭropo. La pioniroj en ĉi tiu landeto estis en 1900—03 E. Barbier, Ed. Picot la Beaume kaj la fama E-isto Gaston Moch. La lasta en 1903 skribis serion da artikoloj en »Le Petit Monégasque« kaj aranĝis kurson, post kio estis fondata EG. En 1905 Léger kaj d-ro Richard, dir. de Oceanografia Muzeo de Monako kaj prez. de la EG, enkondukis E-n en bultenon de la Muzeo. Laŭ la Dietterle-statistiko en 1928 troviĝis nur unu E-isto en la lando.

I. ŠIRJAEV.

Monda Poŝto. Aperis de 1900 kiel »Schweizerpost« en Fischenthal. En 1909 ĝi fariĝis oficiala organo de la »Int. Ligo« kaj ricevis la titolon: »Welt-Post. Monda-Poŝto«. De majo 1925 estas ĝis hodiaŭ la titolo »Monda Poŝto« 8—16 p. (post la milito ofte nur 4) 33×23. Red. I. Thalmann. De majo 1912—julio 1914 ĝi estis kunigita kun »Svisa Espero«, tiamaniere, ke ambaŭ gazetoj ricevis la saman formaton 33×23 kaj estis ambaŭ liverataj al la anoj de Svisa E-Societo. MP reviviĝis en okt. 1919, red. restis ĝis okt. 1922 I. Thalmann en Fischenthal. Poste red. estis: K. Döring en Frankfurt/M., Ferd. Blocher en Hamburg, R. S. Carter en Balbao Heights, Canal Zone (Panama), I. H. Blackney en Saginaw, Mich. USA. Kelkaj n-roj aperis intertempe en Markneukirch (Saksujo) kaj 2 litogr. en Hamburg (Blecher). MP okupas sin nur pri kolektadaj aferoj (precipe poŝtmarkoj), nur inter majo 1912 kaj julio 1914 ĝi ankaŭ enhavis E-propagandon, kursojn, literaturon ktp.

P. TARNOW.

Mondjunularo Katoika. v. MOKA.

Mondo kaj Koro. Originalaj poemoj de Kalocsay, 1921, 32 p. »La verketo montras kunecon de lingva

lerteco kaj poezia kapablo altgradaj«. (G. S. »E«, 1921, p: 28.)

Mongoluj. Grandampleksa sendependa popolo respubliko inter Sovetunio kaj Ĉinlando kun ĉefurbo Ulan-Bator-Hoto (Urga). Sur teritorio de M. ankoraŭ en la unuaj jaroj de E-movado loĝis E-istoj, precipe rusaj, ekz. N. P. Evstifěieff en Urga 1900 kaj I. Puĉkovskij en rus-mongola komerca limurbeto Kjaŝta 1880. Inter la mongoloj mem la E-movado komenciĝis nur post sendependiĝo de M. for de Ĉinlando, kiam tien revenis el eksterlando en 1924 instruisto Hajan Hirob. En 1925 bonan propagandon por E faris en M. vizito de sovetia sesaeroplana flugekspedicio Moskvo-Sanhajo, tiam okazis renkontiĝo inter sovetiaj ĵurnalistoj. G. Rozenblat kaj Hajan Hirob kaj E. servis inter ili kiel interkomprenilo. Pli malfrue, en 1933, multan laboron por E, en M. faris Junŝebu Riĉino, estro de lingvistika sekcio de la scienca komitato ĉe ministerio de popolkterigo. Sub lia gvido estis organizitaj unuaj kursoj de E en Ulan-Bator-Hoto en 1933.

N. NEKRASOV.

Montezemolo, de Carlo Cordero, markizo, italo, generalo en pens. Nask. 7 aŭg. 1858 en Mondovi. Atinĝinte la rangon de majoro antaŭmilite, forlasis la soldatan servon, sin dediĉis al kulturo de siaj grandaj bienoj. Dum la milito komandis montaran artilerian regimenton; estis vundata; du liaj filoj mortis en la bataloj. Li loĝas nun en Castiglione apud Livorno. Tuj post la milito li E-iĝis, vigle laboris por E. Post kelkaj jaroj fariĝis prez. de IEF. Prezidis plurajn italajn E-kongresojn. Sindone helpas en la laboro por E.

Monumentoj. v. Stratoj.

Monumento de Zamenhof. Tomboŝtono de la Majstro en la hebrea tombejo de Warszawa ĉe str. Okopowa. La tombo troviĝas vid-al-vide ĉe la enirejo, sur plej honora loko, kiun la hebrea komunumo donacis senpage kaj helpis aranĝi tre solenan funebroceremonion. La komunumo daŭrigas ĝis nun tiun helpon, je propraj kostoj dekoracias la tombejon, kiam okazas ia ceremonio sur la tombo, ktp. Super la tombo — kiu troviĝas sur

monteto, kies antaŭa deklivo estas ornamita per granda kvinpinta stelo el plantaĵoj — staras ekde 1926 tomboŝtono. La monumento konsistas el kvin grizaj granitaj blokoj unu sur la alia kaj sur ili la terĝlobo. La dua bloko (el malsupre) estas tre granda (pezas ĉ. 2500 kg.) kaj havas el ĉiu flanko ŝildojn, sur kiuj troviĝas surskriboj. Ĉar la tombo troviĝas en angulo de aleo, ĝi havas du antaŭajn flankojn. Sur la pli larĝa — super la steligita deklivo — troviĝas surskribo:

Doktoro

Ludoviko Lazaro

ZAMENHOF

kreinto de Esperanto

naskita 15. XII. 1859. mortis 14. IV. 1917.

Sur la piedestalo, t. e. sub la unua bloko, samflanke, oni vidas maldestre: M. Lubelski, artisto. Ĉe la mallarĝa fronto — sur la dua bloko — ankaŭ sur ŝildeto elgravurita troviĝas surskribo:

STARIGITA
DE TUTMONDA
ESPERANTISTARO

Ĝian starigon organizis la Int. Monumenta Komitato, fondita dum la UK en Praha, 1921. IMK eldonis kuponon kaj fondis en Warszawa Lokan Monumentan Komitaton (LMK), kies prez. fariĝis d-ro W. Robin, sekr. E. Wiesenfeld, kas. B. Weinthal, anoj estis reprezentantoj de ĉiuj Varsoviaj E-aj Organizaĵoj. Por anoncita konkurso alvenis 18 modeloj, el kiuj la ĵugantaro donis 1-an premion de 20 pundoj al la modelo de M. Lubelski. La skotaj E-istoj donacis la veran skotan graniton kaj post la kolektigo de la necesa sumo IMK fariĝis la tutan monumenton en Aberdeen (Skotl.) sub la kontrolo de skulptisto J. Coult kaj honora sekr. Applebaum. Komence de 1926 ĝi estis forveturigita Polujon. La polaj E-istoj kovris ĉiujn elspezojn bezonajn por venigi la monumenton de Danzig al Warszawa kaj starigi ĝin sur la tombejo. Helpis multe per favoroj la pola registaro, la hebreca komunumo, eĉ la laboristoj, prenitaj minimuman salajron. En la ta-

go de la naŭa datreveno, 18 apr. 1926 (oni prokrastis de 14 apr. ĝis la plej proksima dimanĉo) okazis la solena malkovro de la monumento kun la ĉeeesto de reprezentantoj de la pola registaro; belegan parolon aŭdigis ministro Grabowski. Samtage okazis la malkovro de la tomboŝtono de Klara Z, kies tombo troviĝas apude. E. WIESENFELD.

La animo kaj ĉefa efektiviganto de la monumenta afero estis la sekr. de IMK, J. D. Applebaum.

Morariu Eugenia, rumanino, ŝtata oficistino. Nask. 28 marto 1903 en Kassa, (nun Košice en Ĉeĥosl.) Dum 1923—28 sekr. de EK en Cluj (Koloŝvár). De jan. 1927 sekr. de UEA por Rumanujo kaj sekr. de EIR.

Morariu Lizzie, nask. Andersson, svedino, E-instr. Nask. 6 okt. 1909 en Lindesberg. E-ĝis en 1929 pere de T. Morariu, al kiu poste edziniĝis. De 1930 ekzamena komitatano de SEI. Propagandasa E-n per kursgvidado kaj prelegoj ekde 1929 en Svedujo kaj 1931—33 en Germanujo, Svisujo, Aŭstrujo kaj Francujo.

Morariu Tiberio, rumano, E-instruisto, redaktoro, kunlaboranto de diversaj gazetoj ktp. Nask. el gedziĝo de rumano kaj hungarino 28 sept. 1901 en Kassa (Košice). E-isto de 1921 pere de A. Cseh. De 1921 sekr. de EK en Cluj, de 1923 sekr. de REC en Bucuresti. En 1924 instruis E-n en la policoficira altlernejo en B. Fondis en 1924 la RE Instituton kaj estis ĝia dir. Estis ĉefdel. de UEA por Rumanujo. Gvidis Cseh-kursojn en Rumanujo, 1922—28; en Svedujo 1928—31, 1933. Dum la sama periodo li gvidis plurajn kursojn por instruistoj en Stockholm, Helsingborg kaj en Danujo (Odense). Post lia edziĝo al L. Andersson, ili ambaŭ gvidis kursojn en diversaj landoj. Lian instruistan kaj prop-istan sukceson montras la datoj: 100 kursoj, ĉ. 5000 kursanoj, 200 paroladoj, (15 per radio). Kunlaboris al 'E. Triumfonta', poste al HDE, 'E' kaj LM (originalaj noveloj, skizoj, kaj tradukaĵoj). Dume aperis liaj fidelaj, artaj kaj esprimriĉaj tradukaĵoj el la rumana literaturo: 'Niĉjo-Mensogulo' (de Bratescu-Voinesti, 1927), 'Nobela Peko' (de Sadoveanu,

1929), ambau premiitaj de la Akademio, 'Sonorilo kaj Kanono' (de Isaac, 1930). Premiita oratoro dum la UK en 1931. F. SZILAGYI.

Moraviaj Esperanto-Pioniroj. v. Ĉeĥoslovakujo.

Moravujo, v. Ĉeĥoslovakujo.

Moreau (moro) Arie Leopold (ps. Leo; Adepto), nederlandano, instr. en Arnhem. Nask. 6 majo 1888 en Doorn (Utrecht). 5 jarojn prez. de loka EG, nun sekr. Arangis la 4-an Ned. E-Kongreson sept. 1929 en Arnhem. Organizis kaj gvidis Ĉeĥ-metodajn kursojn en Arnhem kaj en ĉirkaŭaĵo, instigis la sekcian estraron inviti eksterlandajn instruistojn. Fondis kaj gvidas la Gelderlandan E-Rondon. Gvidis la int. balon dum la 24-a UK 1932, Organizis la rondvojaĝon de V. Bleier sept.-okt. 1933 tra Ned. Artikoloj, gramatiko en la loka gazeto. Nun mastro de la Esperanto-Domo en Arnhem.

Morgaŭ Matene, tragikomedio de Karinth y, el la hungara trad. K a l o c s a y, 1923, 142 p. »Interesa eksperimento por rompi novan vojon por la teatro. Sub la facila sprito de l' humoristo saĝa profundo de l' filozofio.« (Totsche, De Paĝo, p. 88.)

Morris Alice V., nask. Vanderbilt, usonano, edzino de diplomato (nun ambasadoro en Bruxelles). Kreis la asocion IALA (v.), akcelis la kunlaboron inter la diversaj int. lingvoj. La »Bibliografio de Int. Lingvo« aperis per ŝia subteno.

Morrison (morisn) William, skoto, vinkomercisto. Nask. 16 okt. 1861 en Edinburgh. Ricevis ateston pri kapableco de SFPE, en Paris, 10 dec. 1903. Instruis E-n dum kelkaj jaroj. Verkis teatraĵon (el Dickens) por la 4-a UK; du originalajn prop. komedietojn (»A Norman Conquest« kaj »The Object Lesson«); kaj kunverkis tradukon de »Doktoro Jekyll kaj S-ro Hyde« (R. L. Stevenson).

Mortished (mortišed) R. J. P., irlandano, iama sekr. de Irlanda Laborista Partio. Kunfondinto kaj prez. de IEA. Prelegoj en multaj randoj.

Morton (mortn) James F., usonano, kuratoro de muzeo, mineralogo. Nask. 18 okt. 1870 en Littleton. Kunfondinto kaj prezidinto de ES en New

York; estis dufoje ĉefo de la aga komitato de EANA. Artikoloj.

Moscheles (mošeliz) Felix Stone, anglo, portretpentristo. Nask. 8 febr. 1833 en London, mortis 22 dec. 1917 en Tunbridge Wells. Baptofilo de F. Mendelssohn; tre konata en ĉiaj randoj artistaj kaj pacifistaj. Prez. de Londona EK kaj vicprez. de BEA. Entuziasma propagandisto kaj pioniro.

Mosse Rudolf granda eldon- kaj reklamentreveno en Berlin. Laŭ la instigo de Friedrich Ellersiek ĝi starigis E-fakon en 1926. Kun la celoj eldoni serion de libroj sub titolo Internacia Mondliteraturo. La E-tako laboris per granda reklamo kaj bonaj eldonaĵoj, kies ĉiu nro kostis en serio 0.40 Rm. tamen post la eldono de 25 nroj la firmo ĉesigis la fakon kaj ĝian librostokon transprenis F. Ellersiek.

Mota Mendes (mendiŝ) Hernani, brazilano, d-ro, ing. Kunfondinto de »Grupo Verda Stelo« en Rio de J. Estis ĝen. sekr. de BLE. Faris plurajn kursojn kaj paroladojn.

Motono Seigo, japano, prof. de Teknologia Kolegio en Kyoto. Nask. 15 sept. 1882 en Tokio-si. Verkis »Funkciecaĵ elementoj de Malnova J Arkitekturo kaj nova sento« (E-J); »Arkitekturo Internacia«.

Motteau (moto) Achille, franco angliĝinta, presisto. Nask. en Francujo, mortis 70-jara 3 marto 1905 en London. Verkis diversajn lit. verkojn en franca lingvo. Antaŭe Volapükisto. E-istiĝis en 1901. Verkis: »Seria Kurso« (1903?); »E-A Vortaro«, 1904. Trad.: »La Ventego« (Shakespeare), »Ŝi kinigas por Venki«, k. m. a. Fondis E-G-n en Forest Gate.

Mouton (muton) Henri, franco, dir. de la Krimaj Aferoj, ano de la ŝtata konsilantaro. Nask. 30 sept. 1873 en Carcassonne. Re prezentis Francujon en la Kongreso de Int. Polico en Monaco, tie voĉdonigis la principon de Int. Polica Ofico, kaj akceptigis principe uzon de E. Honora Prez. de la Amika Asocio de la francaj E-aj policistoj. Prez. de la Int. Polica Ligo.

Mraz Josef, aŭstro-germano, faklerneja instr. Prop-isto, faris kursojn, enkondukis E-n en la »Metilernejon

en Linz« kie li gvidas kursojn jam de 3 jaroj.

Mr. Tot aĉetas mil okulojn. Romano, originale de Jean Forge. 1931, 242 p. »Detektiv-romano, sed ne bulvarda, ne harstariga sanga fantazio. Ĝi estas tiel moderna, tiel riĉe saturita de psikaj subpcentroj kaj de la pulsanta vivo, ke ĝia valoro alte superas tiujn pretendojn, kiujn oni ĝenerale havas ĉe la tiaspecaj romanoj« (Jobo, L. M. 1931, p: 160.)

Mučnik Ishak, (ps. Kinĉum); hebreo, unue librotenisto, poste, en Palestino, koloniisto. Nask. 5 apr. 1894 en Ŝepetovka, Rusujo. Pioniro por la rekonstruo de Palestino. E-isto de 1910. Starigis E rondojn kaj kursojn en Ŝepetovka regiono, kie li loĝis ĝis 1920. Verkoj: »Hebreaj Rakontoj«, traduko de Ŝalom-Aleĥem, 1923; prop. broŝuro, 1925. L. K.

Mudie (mjudi) Harold Bolingbroke, anglo, borsisto. Nask. 30 jan. 1880 en London, mortis 6 jan. 1916, dum milita deĵoro en Francujo, pro aŭtomobila akcidento. E-istiĝis okt. 1902, leginte pri E en »The Review of Reviews«. Fondis gazeton 'The E-ist' en nov. 1903, laŭ financa garantio de W. T. Stead. La gazeto tamen liveris ne pardon, sed profiton. Kiam 'T. E.' kunfandiĝis kun 'The British E-ist' en jan. 1906, li aliĝis al ties redakta komitato. Faris multe da alilandaj prop. vojaĝoj kaj vizitis ok UK. Unu el la Trio por la Tria. Prez. de BEA 1912—16, prez. de UEA de la komenco ĝis sia morto. Multe laboris por la eldono de la 'Nova Testamento' en E. LK.

Mudrak Walter Karl, aŭstro-germano, bankoficisto en Wien. Nask. 24 marto 1904 en W. E-isto de 1924. Speciale laboras en katolikaj, junulaj kaj pacifistaj rondoj. Vicprez. de Kat. Unio E—Wien, sekr. de MOKA, sekr. kaj afergvid. de Int. E. Labor-komunumo por »senalkohola kulturo« kaj por »sentabaka kulturo«, estrarano de AEA. Poezia verketo 'Kunlaboro', 1932. Kunlaboranto de 'La Juna Batalanto'; 'Espero Katolika' kaj 'Aŭ. E-isto'. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Muffang (mufan) Henri, franco, licea prof. Nask. 26 sept. 1864 en Pa-

ris. Interesiĝas pri sociologio. Kunfondis la grupon en Angers, 1904, propagandis en lokaj ĵurnaloj, kunlaboris en multaj E-aj gazetoj. Trad. de Jules Renard: Karotharulo, 1907.

Müller Max, germano, lingvisto, univ. prof. en Oxford. Nask. 1823 en Dessau, mortis 1900 en O. En la fruaj jaroj de E, kiam apenaŭ troviĝis aprobantoj de la lingvo int. inter famaj lingvistoj, li plurfoje montris siajn simpatiojn ne sole por la ideo de L. I., sed ankaŭ speciale por E kaj skribis en 1894, ke E havas la plej altan lokon inter siaj konkurantoj.

Multlingva Intersteno. Stenogazeto en multaj lingvoj por ekzerco de la Intersteno (v.). Aperas de 1930, 21×15 cm. Red. H. Friesz, Duisburg, Germ.

Münz (müne) Adolf (ps. Amo; Amu) germano, komercisto. Nask. 18 marto 1875 en Krakovo. Porgeorfa zorgado. 1925—33 del. kaj ĉefdel. de UEA. en Berlin.

Muramoto Tatsuzo, (-cuzoo), japano, antaŭe presejestro, nun senokupa. Nask. 13 jun. 1880 en Oĉayama-si. E-iĝis 1904. Unuafoje en J-ujo fabrikis preslitterojn E-ajn. Multe helpis al d-ro Kroita pri fondo de JEA. »A short Vocabulary English-E and E-Eng«, 1906, presita de lia presejo, estas unua libro en J-ujo. — (Kuw.)

Murata Masataka, japano, eksdir. de tria oficiala internigejo de lepruloj So-tozima-Hoyoin, Osaka. Lektoro de med. fakultato de Univ. Nippon. Nask. 20 apr. 1884 en Koti-ken. Energie klopodis per varma polemiko por la enkonduko de E en japanajn medicinajn rondojn kaj tion akcelis per sia E publikigo de la fama tezo: »La plej simpla metodo por serodiagnozo de sifiliso«, (Medicina monografio, n-ro 1, 1926.) Aliaj verkoj »Serologio de Lepro«, La Lepro, vol. I. n-ro 2, jun. 1930. ktp.

Murath Max, germano, prof. de knabina gimn. en Teplice-Šanov (Teplitz-Schönau) en ĈSR. Nask. 9 aŭg. 1884 en Teplice. E-isto de 1911, daŭre aktiva en prop., organizo, kursoj. Honora membro de ES en Olo-mouc, hon. prez. de EG en T.

Murgatroyd (murgatroj) William A., anglo, analiza kemiisto. Nask. 5 sept. 1893 en Grimsby. E-istiĝis en 1913. Helpis fondi E-grupojn en Newcastle kaj Grimsby. Instruis E-n al centoj da lernantoj.

Muribo Martin, norvego, lignajisto en Oslo. Nask. 27 dec. 1884 en Valdal. Lernis E-n 1917. Estrarano de NEL 1918, kunfondinto de SAT 1921, fondinto de NALE, 1924. Dumviva ano de UEA. Verkis korespondan kurson por laboristoj 1924, kaj lernolibron 1932. Kunlaboranto de 'Sennaciulo', 'La Nova Epoko', 'Arbeider-E-isten'.

Murray (murey) Robert, skoto, ŝtato-ficisto. Nask. 3 nov. 1897 en London. Sekr. kaj instr. de Nord-Londona EK.

Musella Vincenzo, d-ro, italo, blinda prof. pri beletristiko kaj filozofio en la por vidantoj ŝtataj liceoj. Nask. 27 apr. 1894. Antaŭmilita E-isto, havas la diplomon por la supera instruado de E. Kursoj en Napoli, prop. artikoloj. Dufoje gajnis la premion de itala lit. konkurso, E-igante novelojn de Boccaccio. Kunlaboranto de HDE. Preparas originalen aldonon al »Plena Vortaro«.

Mustapha Haĝi Raden, javano, ĵurnalisto. Nask. 11 sept. 1911 en Semarang (Ned. Hindujo). En 1929 forlasis sian landon kaj vizitis 16 landojn en- kaj 6 landojn ekster Eŭropo. E-iĝis en Praha 1931. Laŭ la aranĝo de Ĉeĥosl. AE li faris en 15 febr. — 27 marto 1934 prelegvojaĝon en ĈSR, parolante en 29 lokoj, antaŭ 10.000 homoj. De sept. 1934 ĝis majo 1935 li faras paroladojn en Svedlando laŭ la invito de SEF, ĉiumonate parolante en 25 lokoj.

Muto Marks (ps. Armilov), japano, tradukisto kaj verkisto ĉefe pri int. kaj ĉinaj problemoj. Nask. 7 febr. 1906 en Nagaoka, Niigata-ken. E-isto de 1919. Partoprenis la fondon de Instituto por Scienco Proleta, Tokyo, kaj de J. Proleta E-ista Unio. Ĉefred. de 'Kamarado'. Kompilis kun aliaj 6-voluman 'Proletan E-Kurson', 1931.

Muzika Labirinto. Ludo por muzikistoj kaj muzikamantoj, amuza kaj instrua, (kies celo estas eduko de la muzika memoro), elpensita de kom-

ponistino prof. Everaerts-Zlica (Bruxelles). Ĝi konsistas el 400 slipoj, sur kiuj estas presitaj fragmentoj el muzikverkoj ĉiuspecaj. Ĉiu slipo havas sur la dorsoflanko ordan numeron kaj, en aldonita broŝureto, flanke de ĉiu el tiuj samaj numeroj, staras la titolo de la respondanta muzikverko, ktp. E estas vaste uzata por disvastigo de la M.L., precipe de L. Cogen, 52 Drève, Ninove, Belgujo.

Muzikrotado, aŭtonoma, elpensita de belgo J. Hautstont, celas ĝeneralan revizion de la muzika signaro. Laŭ aserto de ĝiaj adeptoj »A. M. N. estas la ununura solvo plena de l' problemo de la reformo de l' muzikskribo, per la reguligo kaj la plisimpligo de la signoj.« Por disvastigo de A. M. N. servas int. societo, kiu uzas ankaŭ E-n; ĝia gvidanto: L. Cogen.

Muziko. Iugrade, muziko estas mem int. lingvo. Ĉe kantado, tamen, aparas malfacilaĵoj, kiujn nur E kontentige solvas. La koncertoj en E-istaj kunvenoj, la kantado de infanoj en lernejoj E-kursoj, kaj la vasta E-a muzika literaturo, provas ĝian taŭgecon por kantado. Efektive, pro sia riĉeco de puraj vokaloj, E sone egalas la italan. E-a traduko povas esti pli fidela, ol nacilingva; kaj ebligas internacian kantadon kaj komprenon de naciaj kantotrezoroj. — Inter multo da kantaraj naciaj, religiaj, laboristaj elstaras 'Internacia Kantaro' (Bennemann), 'Koncerta Kantaro' (Zermans), 'Kantaro Esperanta' (Butler), 'Himnaro Esperanta' (Butler), 'Proletaria Kantaro', aliaj kolektoj de laboristaj kaj popolkantoj, fine rimarkinda serio de kantoj eldonitaj de la firmo 'Simfonia' en Moskva. 'La Espero' de F. de Ménéil estas sur la lipoj de ĉiu E-isto. — Prova 'Muzika Terminaro' estas eldonita de F. de Ménéil en 1908 kaj kompletigita de li mem, kaj multe plibonigita de Adela Schaefer, en 'Int. Scienca Revuo' (1910). Tamen la E-a muzika terminaro restas en preskaŭ tiel haosa stato, kiel la naciaj: la E-aj tempo, takto, tono, ekz., estas tiel dubencaj, kiel la germana takto, la anglaj tone kaj note.

M. C. BUTLER.

Mybs (mibs) Eduard, germano, d-ro med., kuracisto. Nask. 30 dec. 1858, mortis 4 jun. 1923 en Altona. Estis LK, vicprez. de la Akademio kaj de la 1-a UK en Boulogne 1905, prez. de UK en Dresden 1908, fondinto de GEA kaj ĝia prez. dum multaj jaroj, same de Unua EG de Hamburg-Altona kaj de Nordal-

binga Ligo. Faris multajn paroladojn kaj multajn kursojn en ĉiuj partoj de G., verkis artikolojn por gazetoj, jarlibroj k. s.

Myslik (mislik) Karl, aŭstro-germano, paroĥestro. Nask. 19 sept. 1872, mortis 24 jun. 1930. Trad. 'Undine' de Motte-Fouquet, verkis originalajn poeziaĵojn. Multe laboris por E.

N

Naciismo. Studo, originale de E. Lanti pri la deveno, evoluado kaj sekvoj de la naciismo. SAT, 1930, 124 p.

Nagata Hidezirô (-jiroo), japano, verkisto, membro de Supera Domo, prez. de Imperia Eduka Asocio, prez. de patriota grupo Kenkokukai. Nask. 23 jul. 1876 en Hyôgo-ken. Favoranto de E. Por la viktimoj de tertremego en 1923, li, tiama urbestro de Tôkyô, verkis konsolfrazon kaj enterigis ĝin kun ĝiaj E-a kaj angla tradukoj en budaisman monton, por konservi ĝin je dek mil jaroj. — (Kuw.)

Nagy (nadj) József, hungaro. Malnova E-isto, kunfondinto de HESL kaj ĝia reviviganto post la milito, en 1924 ĝia prez.

Nagy-Molnár (nadj-molnár) István, hungaro, pens. ŝtatoficisto, nun loĝas en Gyôr. 63-jara. Antaŭmilita energia laboranto por E en Pozsony (nun Bratislava en Ĉeĥosl.) Estis vicprez. de HES. (I. H. Herald, 1930. N-o 3. p.3.)

Nakagaki Kojiro, japano, pentristo. Nask. 20 apr. 1894 en Kumamoto-ken. Unu el la gvidantoj de J Prolet-E-ista-Unio. Verkis lernolibron, trad., Malsato en riĉa rikoito, 1932.

Nakahara Syuzi (ŝuuji), japano, mastro de Kaniĵa Librejo. Nask. 1 dec. 1894. Eldonis kelkajn E-librojn inter kiuj J-E vortareton.

Nakamura Kijoo, japano, d-ro de scienco, dir. de Japana Centra Meteorologia Observatorio, Kolegio por Fiziko, kaj aliaj sciencaj institucioj. Membro de J. Imperia Akademio. Nask. 19 apr. 1855 en Hagi, Yamaguti-ken, mortis 3 jan. 1930 en Tô-

kyo. En 1907 E-istiĝis sur ŝipo al Francujo. Vicprez. de JEA. Ĉefdir. de JEI ĝis la morto. En komencaj jaroj multe subtenis la movadon morale kaj materie. Multaj originalaj sciencaj artikoloj en E kaj lit. tradukaĵoj: Verkoj de d-ro Nakamura, 1932.

Nakaniŝi Joŝio, japano, mekanika inĝeniero. Nask. 5 nov. 1899 en Wakamatu-si, Hukuoka-ken. Ĉefdir. de Budaisma Savarneo, dir. de J. Budhana Ligo E-ista, del. de ŬEA kaj prez. de ES en Kisiwada. Verkis: Gramatiko kaj Vortareto de E en brajlo, 1928. Red. »La Lumo Senbara«, 1925-26, »La Libero« (prop. de B-ismo), 1930—33. — (Kuw.)

Nakano Ŭiŝiro, japano, okulisto, vicprez. de Kuracista Unio en Kyoto. Nask. en 1813 (?), mortis 14 okt. 1930 en K. Pioniro en K. Komencis E-n per fama koresponda kurso de Gauntlett, 1906. Nobla, bonkora, monhelpema. Li ĉiam diris: kiam mi mortos, metu Fundamenton de E sur mian bruston kaj kantu la E-an Himnon.

Nalli Vitangelo, italo, d-ro med. Nask. en 1876, mortis en 1932 en Genova. En 1903 ekpropagandis en Palermo kaj gvidis kursojn ankaŭ ĉe la Univ. Fondis la Sicilian Fed. E-an, (por kies patronado li akiris altrangulojn), kaj la revuon »Idealo«. Verkis gramatikon. Translokiĝinte en Tunision en 1909, li forlasis la movadon.

Narita Ŝigeo, japano, historiisto de arto, diplomito de Lit. Fakultato de Univ. de Paris. Nask. 1 jul. 1893 en Akita-ken. Re prezentis la J-an E-istaron ĉe la 13-a kaj 14-a UK-j.

Nash (naŝ) Geoffrey Dalrymple, anglo, laŭvice multaj profesioj. Nask. 14 jan. 1882 en Aston Cantlow. Verkis poemojn kaj artikolojn por angla kaj aŭstralia gazetaro. Reveninte Anglujon el Aŭstralio, sin dediĉas precipe al E-propagando. Lia poemaro „Miniaturaj“ aperis en 1931.

Natan la Saĝulo. Drameca poemo, verkita de Lessing en 1779, el la germana trad. Minor. 1923, 208 p. Ĝia problemo: la ideo de la homamo kaj toleremo superanta la dogmojn kaj malamon, ĉar unue ni estas homoj kaj nur poste kristanoj, judoj aŭ mahometanoj. Laŭ la tradukinto oni devas konsideri la tradukon unue kiel E-an poemon kaj nur duvice kiel tradukitan el alia lingvo klasikan dramon.

Naturamikoj, v. Sporto.

Naturscienco, Mondkoncepto, Religio. De Reinke, trad. Ewald Brenken. 1927, 164 p. Filozofia traktajo pri problemoj de la scienco kaj kredo. Multaj citaĵoj porreligiaj.

Naumann Hermann Albrecht, germano, pormetia supera instr. Nask. 13 aŭg. 1890 en Chemnitz. E-isto de 1912. Enkondukis E-n en popolernejojn de Werdau, 1920 kaj 1922. Eldonis la gazetan servon de GEA de jul. 1920 ĝis dec. 1927. En 1928 elektigis prez. de Saksa Ligo de GEA, en 1930 organizis infaninterŝanĝon inter Saksujo kaj Danujo, en la sama jaro Cseh-kursojn sub gvidado de ges-roj Morariu el Örebro en sep lokoj kun ĉ. 500 anoj, faris en 1931 radioparoladojn kun Morariu kaj Scherer (Dresden-Leipzig). Verkis artikolojn kaj kursojn por la gazetaro, prilaboris multajn gvidfoliojn kaj -librojn.

Naŭu Canggih Fu, ĉino, bienulo, negocisto. Nask. 16 jul. 1903, mortis 9 marto 1932. E-isto de 1925. Komitatano de SEA (Shanghai). Propagandis energie en Chinking kaj organizis tie asocion.

Naville (navij) Ernest, franco svisa, filozofo, kelkan tempon univ. prot. en Genève. Nask. 13 sept. 1816, mortis en 1909. Unu el la malmultaj scienculoj, kiuj en la 19-a jarcento atentis E-n. En 1899 li sendis gravan raporton al la Franca Akademio de sci-

encoj, kies membro li estis, pri la lingvo int., kaj konkludis tute favore al E. Eĉ 88-jara li parolis por E en la filozofia kongreso en Genève. Lia verko »Devo« aperis en E-a traduko de Antido.

NEB. Nova E-Biblioteko (v.).

Neceso kaj sufiĉo. La teksto de la fama principo, aperinta unue en la Oficiala Gazeto (majo 1913) estas la jena:

»La Akademio rekomendas al la E-istaj aŭtoroj, ke ili sekvu la du jenajn principojn, kiuj kontraŭstaras unu la alian kaj estas la logika bazo de vortfarado en E.:

a) Principo de neceso: en konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝojn necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentot-an de tiu vorto;

b) Principo de sufiĉo: se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa.«

Esplorante ĉi tiujn du principojn oni vidas, ke la Principo de Neceso evidente postulas la fikson de la gramatikaj radikarkarateroj (v. Vortfarado). Nome, por scii, ke nobelo, najbaro jam klare elvokas la ideon de persono, dum nobl kaj proksim bezonas por tio la sufikson ul (noblulo, proksimulo), oni devas scii ankaŭ, ke nobel, najbar estas substantivaj, nobl, proksim estas adjektivaj radikoj. Same, ke por signi ilon broso sufiĉas, dum oni devas diri kombilo, tio sekvas el la subst. karaktero de broso, kaj el la verba karaktero de komb. La principo de neceso do sen la karakterfikso de l' radikoj pendas en la aero.

La dua principo, kiun, kontraŭ alia teksto de Saussure, oni akceptis laŭ la propono de Cefeĉ, ne estas felice conceptita, ĉar ĝi enkondukas la ideon de kunteksto, kiam temas pri konstruo de aparta vorto. La kunteksto povas havi rolon en stilo poezia, sed en proza, precipe en scienca verko ĝia troa utiligo povas naski konfuzojn, do estas tute ne rekomendinda.

La originala teksto de Saussure tekstas:

»b) Principo de sufiĉo: oni ne devas senutile ripetigi dufoje la saman ideon en la sama vorto kaj oni ne devas enkonduki en la vorton fremdajn ideojn ne entenatajn en la ideo esprimita.«

En unu frazo oni povus resumi la P-on jene:

»Oni enkonduki en vorton ĉiujn elementojn, kiuj necesas, sed ne pli ol kiom sufiĉas por la klara kaj plena elvoko de la ideo esprimita.«

KALOCSAY

Nederlanda Esperantisto. Of. org. de NSE »La Estonto estas Nia«. Fondita en 1931 Aperas en ned. lingvo kaj en E. Formato 24,5×15,5. Red. P. W. Baas kaj H. de Wolf.

Nederlanda Ka'oliko. Gazeto en ned. lingvo kaj en E. Fondita en 1910. Formato 21×14. Redaktis Smulders, Damen, Heilker; nun Brouwer.

Nederlando. Ĉar Nederlando por siaj komerco kaj trafiko havas multnombrajn interrilatojn kun la cetera mondo kaj ĉar ĝia lingvo estas nur malmulte konata, la nederlandanoj estas devigitaj multe okupi sin pri la lernado de fremdaj lingvoj. La angla, franca kaj germana lingvoj estas instruataj tre multe kaj granda parto el la iom kleraj homoj scias pli malpli almenaŭ unu el tiuj lingvoj. Ŝajnas, ke ĉi tiu situacio malfavore influis la disvolvigon de la E-movado kaj iom malhelpis ĝian disvastiĝon. Alie ne estas klarigeble, pro kio, malgraŭ la multa propagando, E en la unuaj 25 jaroj ne pli rapide progresis.

La komenco de la E-movado datumas de 1901, kiam D. Uitterdijk komencis sian pioniran laboron per publikigo de la unua detala lernolibro, verkita laŭ »Manuel Complet« de Beaufront. En 1902 li ekeldonis »La Holanda Pioniro, regula monata gazeto kaj tempa ligilo inter la E-istoj en la holande parolantaj landoj.« Sur ĝia titolpaĝo estis presata »Oficiala organo de l' klubo, la estonteco estas nia!.« Ĉi tiu klubo tamen nur ekzistis sur papero! La enhavo de la gazeto konsistis el dulingvaj informoj pri la movado, tradukaĵoj kaj ekzercoj. La kunlaborantoj estis tre malmultaj; la

redaktor-eldonanto mem devis pleniĝi preskaŭ la tutan gazeton. Ĉar la abonantaro ne atingis eĉ la nombron 100, »La Holanda Pioniro« baldaŭ ne plu aperis regule kaj post tri jaroj eliris la lasta (16-a) numero. Sed la holanda pioniro mem ne ĉesis labori! Dank' al lia persista laboro kaj la helpo de C. J. Baart de la Faille, H. Blok, H. J. Bulthuis, R. H. Homulle, D. F. Romein (aŭtoro de la unua propaganda broŝuro), Bruno P. Tide-man, W. J. Steinbuch, A. M. Valetón k. a. la nombro da E-istoj iom post iom kreskis. La 16an de Nov. 1903 starigis en Utreĥt la unua E-grupo, kies fondintoj estis: Baart de la Faille, J. van Beusekom, J. van Enschut, G. van Romburgh, Romein kaj C. H. de Vos. Sekvis Amsterdam (1905; iniciatinto: R. H. Homulle, aktivaj agantoj: H. Blok, J. de Haan, H. J. Weg), Rotterdam (1906, M. J. Wes-sel) kaj Hago (1906, Bulthuis). La amsterdama grupo aperigis gazeton »Amsterdama Pioniro.« Jam la 27an de Aug. 1905 starigis la Holanda Societo E-ista »La Estonto Estas Nia« (Poste oni anstataŭis »Holanda« per »Nederlanda«; mallongige oni nomas ĝin »LEEN«). Ĝiaj unuaj estraranoj estis: Baart de la Faille, H. Blok, Romein, Uitterdijk kaj Valetón. En 1909 ĝi transprenis »Amsterdaman Pioniron« kaj daŭrigis ĝin kiel »La Holanda Pioniro.«

La propagandon por E inter la katolikoj komencis J. Lüneman kaj H. B. van Zwet, kiuj en 1907—08 tradukis artikolojn el »Espero Katolika« kaj aperigis ilin en katolikaj gazetoj. Baldaŭ aliĝis al ili T. H. W. Elbers, pastro Faber kaj W. Lutkie. Ĉi tiu kvino formis »provizoran komitaton« kaj publikigis alvokon al la nederlandaj katolikaj E-istoj por fondi katolikan E-ligon. Al ĉi tiu alvoko ne venis eĉ nur unu respondo! Tamen la komitato daŭrigis labori, varbis aprobantojn por sia ideo kaj la rezulto estis, ke la 29an de Aug. 1909 fondiĝis la Nederlanda Katolika E-ista Ligo »Nederlanda Katolika« (»N. K.«). Estraranoj estis: Elbers, Lüneman, J. P. L. Niesten, pastro L. J. J. M. Poel, prof. pastro G. van Poppel, Dr. J. N. J. Smulders kaj

H. B. van Zwet. Komence la Ligo havis ĉ. 100 membrojn. Katolikaj grupoj ankoraŭ ne ekzistis, sed tuj post la starigo de »N. K.« jam fondiĝis tiaj en 's-Hertogenbosch, Rotterdam, Schiedam kaj poste en aliaj urboj. Ekde 1910 »N. K.« eldonis monat-gazeton kun la sama nomo, redaktata de d-ro Smulders. La katolika movado kreskis tiel, ke jam en 1911 ĝi povis organizi la 2-an int. katolikan E-kongreson en Hago. Du jarojn poste la membronombro de »N. K.« jam superis tiun de »LEEN« per 100%!

Inter la laboristoj J. L. Bruijn faris la unuan propagandon, publikigante kurson en ĉiutaga popolgazeto en 1906. Laŭ lia iniciato starigis en 1907 en Hago la unua laborista grupo, kies ĉefaj aktivuloj estis Bruijn, R. Coomans, Lüneman (kiu poste laboris en la katolika movado) kaj K. H. Meijer. Ĉi tiu grupo aperigis 2 gazetojn: »Frateco« (1908—09) kaj »Laborista E-isto« (1910—11). En 1907 ankaŭ fondiĝis grupo en Amsterdam, en kiu W. Nutters ludis gravan rolon. Starigis en 1911 la »Nederlanda Federacio de Laboristaj E-istoj« (»Fed.«), konsistanta komence el nur 2 sekcioj! La estraron konsistigis Nutters, prez., Meijer, sekr. Coomans, kas., H. J. de Bie kaj Krijger. Aperis (1912—14) monata gazeto »Arbeider Esperantist« (Laborista E-isto) kiun redaktis Nutters kaj poste Meijer.

En la komenco de 1913 la nombro da organizitaj E-istoj estis jena (laŭ »La Holanda Pioniro«, febr. 1913), »LEEN«: 14 grupoj, 459 membroj, »N. K.«: 15 grupoj, 921 membroj, »Fed.«: 8 grupoj, 209 membroj, Zelanda (provinca) Prop. Komitato 6 grupoj, 152 membroj, izo'itaj grupoj 13, 294 membroj; do entute 2035. Komparante ĉi tiun staton kun tiu de sept. 1911 oni konstatas kreskon de ĉ. 500 membroj en 1¼ jaroj.

El la periodo antaŭmilita estas ankoraŭ menciinde, ke »LEEN« starigis E-ekzamenojn (1908) kaj Gazetarklubon por propagandi kaj defendi E en la gazetaro, ke ĝi organizis en 1913 tri-tagan Nederlandan E-Kongreson, ke la katolikaj E-istoj en Nederlando

ludis gravan rolon en la int. katolika movado kaj eĉ gvidis la int. organizon kaj ĝian organon, ke en 1908 E estis enkondukata kiel instrua fako en la edukejo »St. Louis« en Roermond, ke el la laboristaj gvidantoj nederlandaj preskaŭ nur la anarkistaj iom favoris E, ke la int. laborista E-organo »Internacia Socia Revuo« dum kelka tempo (1910—14) aperis en Nederlando kaj ke en 1912—13 okazis komunumaj E-kursoj en Hago.

La mobilizo en 1914 kaj ĝiaj sekvoj haltigis la regulan evoluon. La »Fed.« ĉesis funkcii kaj ĝia organo ne plu eliris »LEEN« kaj »N. K.« pro perdo de membroj malplifortiĝis. En pluraj lokoj la movado vegetis aŭ tute stagnis. Sed estis ankaŭ lokoj, kie la E-vivo daŭris. Starigis eĉ novaj grupoj, i. a. en la tendaroj de belgaj internigitoj, kie Fr. de Backer, H. Bonabo, H. J. Demeersman k. a. multe propagandis. Aperis propaganda kaj informa gazeto »Semereto«, eldonita de Fratoj Bek en Veghel kaj redaktita de P. A. Schendeler, kiu dum la tuta jaro 1916 regule ĉiusemajne eliris. Diversaj pacifistaj organizoj, kies sidejo estis en Nederlando uzis la servojn de la E-istoj, publikigante artikolojn en E-aj gazetoj. La Konsilantaro Nederlanda kontraŭ la milito, la Komitato Eŭropa Federacio kaj la Movado por rifuzo de militservo aperigis eldonaĵojn en E.

En la fino de 1918 montriĝis signoj de revigligo, kiu esprimiĝis i. a. per apero de semajna prop. gazeto »Nederland-Esperanto«, eldonata de J. L. Bruijn, per restarigo de la »Fed.« kaj per ioma kresko de la E-istaro. Grava okazantaĵo estis la 12-a UK en Hago 1920. Ĝi donis fortan stimolon al la movado. En 1920—23 »LEEN« kaj la »Fed.« eldonis la gazeton »Nederland-Esperanto« kiel komunan organon, de 1922 sub la titolo »Holanda E-isto«. Poste la gazeto iĝis privata posedaĵo de A. Kloek kaj C. G. Sterkenburg, la tiamaj red. kaj adm., kiuj daŭrigis la eldonon kiel »studa gazeto por komencantoj kaj progresintoj«.

Menciinda estas epizodo, en kiu J. van Hengel ludis rolon. Ĉi tiu estis stariginta t. n. »Holanadan E-Ofice-

jon« kaj eldonis monatan prop. gazeton »Wereldtaak« (Mondlingvo) en 1924—27. En 1925 estiĝis kontrakto inter li kaj la posedantoj de »Holanda E-isto«, laŭ kiu li prizorgus administradon kaj reklamadon de la gazeto. Sed li ne pagis la presiston, aperigis de li mem redaktitan numeron de gazeto, ktp. Pro tio la eldonantoj devis provizore ĉesigi la eldonon. Tiam Van Hengel komencis grandska'an konkurenca'n entreprenon eldonis gazeton »Holanda E-Pioniro«, lernolibron ktp., faris el »Holanda E-Oficejo« anoniman societeton, establis propran presejon, fondis Nederlandan Esperanto-Asocion, starigis Universalan Spesmilan Bankon kaj... bankrotis en 1927.

Dume »Holanda E-isto« estis reaperinta en 1926 en iom alia formo. Ĉar »La Holanda Pioniro« ne plu ekzistis de 1921 kaj ankaŭ la »Fed.« ne plu disponis pri sia organo »Intermembra Informilo«, aperinta en 1923-25. »Holanda E-isto« servis parte kiel neoficiala komunikilo de »LEEN« kaj la »Fed.« Ankaŭ aliaj organizaĵoj povis uzi iom da spaco en »Holanda E-isto.« La »Fed.« sur ĝiaj paĝoj kontraŭis la »SAT«-ideojn, kiujn propagandis grupeto de lab. E-istoj per ciklostilitaj gazetoj, »SAT-Propagandisto« kaj »Nederlanda Laborista E-isto« en 1925-28. Krom la ĉefredaktoro Kloeck kunlaboris al »Holanda E-isto« H. J. Blokker kaj por la ekzerĉrubrikoj H. C. Mees kaj P. J. Soeters. Jan van Schoor publikigis en ĝi poemojn.

En Nijmegen kelkaj aktivuloj starigis en 1926 »Centran E-Propagandan Komisionon.« Ĉi tiu aperigas de 1927 ĉiujare bele presitan skriban kurson en 26 semajnaj lecionoj, kiuj de 1930 ankaŭ estas pritraktataj per radio. Ĉiujare abonas ĝin ĉ. 3 ĝis 4 mil personoj.

Kelkfoje la naciaj organizaĵoj kunlaboras. Tio okazis i. a. ĉe la aranĝo de la landaj kongresoj en Hilversum (31 Majo—1 Jun. 1925), Nijmegen (22—24 Majo 1926), Haarlem (28—29 Majo 1927). (La kvaran kongreson en Arnhem 21—22 Sept. 1929 ne partoprenis la »Fed.«) De 1917 la E-ekzamenoj estas organizataj de »LEEN«

kaj »NK« kune. Dum 1931—32 la Fed. klopodis por esti akceptata kiel kunorganizado de la ekzamenoj, sed ĉar oni ne volis allasi ĝin sur demokrata bazo, ĝi en 1932 mem funkciigis ekzamenan komitaton. De 1935 ekzistas komuna komitato de LEEN kaj la Fed. En 1930 ekfunkciis Gazetarservo, konsistanta el reprezentantoj de »LEEN«, »NK« kaj la »Fed.« Krome starigis en 1930. Komitato por enkonduko de E en la elementaj lernejoj, en kiu partoprenis ĉiuj E-aj kaj kelkaj gravaj instruistaj organizaĵoj.

Ne mankis eksteraj sukcesoj. La konferenco »Paco per religio«, Aŭg. 1928 en Hago uzis E kiel nuran traduklingvon kaj eldonis protokolon en nederlanda kaj E-a lingvoj. La proks. samtempe okazinta kongreso de kontraŭmilitaj predikistoj aperigis sian protokolon ankaŭ en E. Al E-istaj fervojistoj estis permesate porti dum la deĵoro la E-an insignon. En Hago la instrukcioj pri manipulado de la aŭtomata telefono afiŝitaj en la telefonaj stacioj estas redaktitaj ankaŭ en E. La ministro por instruado, kiu kelkfoje reprezentigis sin en la UK-oj, decidis (2-5-31, N-ro 4124-I), ke povas esti donata E-instruo en komercaj kursoj kaj lernejoj, por kio estos pagata subvencio, se estas almenaŭ 5 lernantoj. Krome li donis iom da oficialeco al la E-ekzamenoj, nomante komisiiton por ĉeesti ilin. En 1925 la urbo Nijmegen donis bonan ekzemplon, enkondukante E kiel nedevigan fakon por la 7-a lernjaro en la popollernejoj. Ĝin sekvis aliaj kaj en 1930—32 jam okazis kursoj aŭ instruado sub aŭspicioj de la komunuma estraro en diversspecaj lernejoj kaj institucioj en ĉ. 15 lokoj. Krome en kelkaj aliaj lokoj la urbestro donis subvencion al la E-grupo. Inter la edukistoj prof. Casimir, konata pedagogo, kaj Theo Thijssen, verkisto, redaktoro kaj estrarano de instruista sindikato, esprimis sian favoron pri E. La »Ligo de nederlandaj instruistoj« akceptis en sia kongreso 1931 proponon, ke ĝi agadu por enkonduko de E kiel nedeviga fako en la 7-a lernjaro kaj instigu la ministrojn starigi ŝtatan E-

ekzamenon. La urbestro de Arnhem disponigis senpage al la en 1930 de Julia Isbrücker kaj Andreo Cseh fondita Int. Cseh-Instituto, kiu celas eduki Cseh-metodajn instruistojn, bele situantan konstruaĵon por okazigi kursojn, konferencojn ktp.

En 1928—31 la kresko de la movado kaj pliiĝo de ĝia influo komencis esprimi sin ankaŭ per la membrociferoj. Laŭ iniciato de la haga grupo »Fine ĝi Venkos« venis al Nederlando Andreo Cseh. Li instruis en diversaj »LEEN«-sekcioj kaj varbis multajn novajn adeptojn. Ankaŭ la skriba kurso de Nijmegen liveris kvanton da novaj E-istoj. Katolikaj E-istoj ricevis apogon de la pastro-filologo Gerlach van Royen, kiu favore juĝis pri E, dirante, ke ĝi estas postulo de la nuna tempo. Okazis en 1928 la 13-a int. katolika E-kongreso en Tilburg. La katolika Rad od s'udigo elsendis informojn pri kaj kurson en E. La »Fed.« ekhavis novan gvidantaron en 1928, komencis intertraktojn kun »SAT«, ekeldonis gazeton »Laborista E-isto«, atingis, ke ĝi povis elsendigi per la Laborista Radio-Amatora Unuiĝo informojn pri E kaj eĉ kurson (1931—32) kaj helpis organizi la 11-an »SAT«-kongreson en Amsterdam. En 1930 ĝi ŝanĝis sian nomon en »Federacio de Laboristaj E-istoj en la regiono de la nederlanda lingvo« kaj de tiam ankaŭ havas sekciojn en Flandrujo. En 1931 ankaŭ la ortodoks-kristanaj E-istoj starigis sian organizon, la »Nederlandan Kristanan E-Societon« kaj ekeldonis »Kristanan Gazeton.« La membronombro de ĉiuj naciaj organizoj kreskis de ĉ. 1500 en la fino de 1928 ĝis pli ol 4500 en la fino de 1931. Ankaŭ en la partopreno je la ekzamenoj respegulis sin la kresko de la movado. En 1927 partoprenis 386 kandidatoj, el kiuj sukcesis 267, en 1931 ĉ. 1000, el kiuj sukcesis 688. En la fino de 1931 »Holanda E-isto« malaperis kaj naskiĝis »Nederlanda E-isto«, dusemajna organo de »LEEN.«

De tiam ĉiu el la landaj organizoj disponis pri propra organo, kio estas grava faktoro por la disvolviĝo de la movado. Ĉi tiu ankaŭ en 1932—34 regule kreskis. Precipe la Fed. multe

progresis, tiel ke ĝi en 1934 estis la plej granda el la E-organizoj. Malĝoja okazintaĵo estis interna malpaco en LEEN, kiu kaŭzis en 1934 eksigon de parto el ĝiaj sekcioj kaj ties kuniĝon en nova organizo, la N. E-Gruparo.

Literaturo, La unua eldonaĵo pri E estis la broŝuro de D-ro Z pri la int. lingvo E, trad. de J. M. Vaz Diaz (Esp. no. 97), publikigita en Uppsala 1896. En 1900 aperis malgranda lernolibro de 13-jara gimnaziano, J. C. Bruijn. Ĉi ambaŭ verketoj ne havis multan signifon. Post la lernolibro de Uitterdijk, jam menciita, eliris multaj aliaj. La plej gravaj el ili estas tiuj de G. H. Benink (2 eld.), A. Blok (13 eld.), Bulthuis (2 eld.), C. J. kaj J. C. Dirksen (4 eld.), P. van Dokkum (2 eld.), P. Heilker (2 eld.), J. Lem (por laboristoj), P. A. Schendeler (4 eld.), J. W. Sevenhuijsen (por la junularo). La E-ŝlosilo kun vortareto N-E prilaboris H. Blok (9 eld.). La ĉefaj vortaroj estas tiuj de Uitterdijk N-E kaj E-N, tiu de »Mercurio« (W. J. v. d. Haak, M. J. Wessel, L. Wit), poste reviziita de H. C. Mees, la poŝvortaro de C. L. de Veer (2. eld.), la vortaroj E-N kaj N-E de A. G. J. van Straten. Aliajn lernilojn verkis aŭ kompilis Bulthuis, G. J. Degenkamp, F. Faulhaber, d-ro F. C. Domenicus, J. B. Eiselin, Mees kaj »Mercurio«. Verketojn pri la movado kompilis G. P. de Bruin, Isbrücker kaj J. M. Munters. Propagandaj broŝuroj aperis de Frato Augustinus, Baart de la Faille k. J. R. G. Isbrücker (kontraŭ Ido), H. Blok, G. P. de Bruin, d-ro Domenicus, J. B. B. Dufrenne, C. P. F. Everts, F. Faulhaber (trad.), J. P. L. Niesten, Nutters, Kloek, H. Linnebank, Lutkie, Smulders, Romein, Uitterdijk, P. J. Vermaas, W. van Zon, Homulle (trad.), Tradukoj el la nederlanda literaturo estas i. a.: P. A. S. van Limburg Brouwer, Akbar (J. C. k. J. R. G. Isbrücker kaj J. Ziermans), J. van den Vondel, Gijsbrecht van Amstel (J. R. G. Isbrücker), Hildebrand, Camera Obscura (fragmentoj, H. C. Mees), F. van Eeden, La malgranda Johano (Bulthuis), S. Ulfers, Ostlorn (Wessel),

Ivans, La viro el Francujo (W. Versteeg-Graafdijsk), Holst, Jaĉjo Holm kaj liaj amikoj (van Leeuwen).

Por la disvastigado de literaturo zorgis la Generala Librejo »Espero« en Hago (1911—14), dir. J. L. Bruijn kaj poste la »Centra E-Librejo«. Ĉi tiu, privata entrepreno de Bruijn, transformiĝis en 1919 en anonima societo kun financa partopreno de diversaj E-istoj. Ĝia akcia kapitalo estas 10.000 guldenoj, el kiu ĉ. triono estas efektive engaranta. Lastjare (1933) la rentumo estis 5½%. De 1922 la librejo estas gvidata kiel fako de profesia librejo. En 1932 la Fed. starigis Libro-Servon, kiu ne nur vendas, sed ankaŭ mem eldonas diversajn gravajn verkojn, ĉefe instruajn. En 1933 ĝi vendis je valoro de ĉ. 9.000 guldenoj. Depost 1930 ekzistas Centra Katolika E-Librejo en Eindhoven.

Gravaj ne-E-aj firmoj, kiuj eldonis E-ajo(j)n estas: H. Honig, Utrecht, H. Meulenhoff, Amsterdam, P. Noordhof N. V., Groningen, W. J. Thieme & Cie, Zutphen, J. B. Wolters, Groningen, N. V. Joh. Ykema's Uitgevers Mij., Den Haag, Nijgh & Van Ditmar N. V., Rotterdam, N. V. Lecturis, Eindhoven, Calenbach, Nijkerk.

Societoj. »Federacio de Laboristaj E-istoj en la regiono de la nederlanda lingvo«. F. Faulhaber, prez., A. Veen, sekr., F. Koch, kas. kaj adm., H. W. Alings, red., F. G. Kroonder, libristo, W. Prent, E. Faulhaber-Ciskovska, J. De Lange. Sekr. por Flandrio: Th. Mortiers. Konsilantaro: J. Alta, O. Brandsma, C. de Cock, H. Garten, van Gersom, A. Henstra, J. Houtekamer, A. Nevenzeel, H. Rijpstra, J. van Scheepen, A. Tillemma Heijnen, G. Vonk, G. Vrees, E. Willekens, J. van Wijngaarden. Organoj: »Laborista E-isto«, monata, 32×25 cm, 8-paĝa, 4000 ekz.; »La Progresanto« (studgazeto), monata, formato kaj amplekso kiel L. E.; »La Vojo«, por infanoj, ciklostilita; krome ĉiu membro ricevas Sennaciulon. Membroj: ĉ. 3000 (inkluzive simpatiantaj membroj kaj organizoj); sekcioj: 93. Servoj: librejo, ekspozicioj, vojaĝantaj bibliotekoj, gazetarservo, ekzamenoj. Enspezoj 1933: saldo 1932 F. 332.02, kotizoj

F. 3855.08, organo F. 895.03, libro-servo F. 1450.—, diversaj F. 341.57. Elspezoj 1933: organo F. 3649.66, Sennaciulo F. 683.28, afranko F. 315.55, skriba kurso F. 567.32, administro F. 602.—, kunvenoj kaj kongresoj F. 487.74, donacoj F. 65.—, subvencioj F. 82.42, kontorajtoj F. 177.05, gazetarservo F. 96.85, diversaj F. 135.99, saldo F. 10.84. Aktivuloj: J. Benjamin, H. Bishoff, J. Bout, Th. Buijs, J. Diehl, C. de Klerk, L. van Munster, J. W. Minke, W. Mudde, F. de Regt, G. Woud.

Nederlanda Katolika Esperantista Ligo »Nederlanda Katoliko«. H. Damen, prez., F. Marvee vicprez., F. J. v. d. Burgt kaj P. G. Brand, sekr-oj, L. Weyts, kas. A. Beek, J. P. Korting, P. H. Penders kaj J. H. Westen estraranoj. Pastro L. J. Poell religia konsilanto. Membroj: 1128, kiuj estas aŭtomate membroj de IKUE; lokaj grupoj: 33; lokoj, en kiuj la anoj loĝas: 219. Organo: Nederlanda Katoliko, monata, 21×14 cm. 12—16 paĝa; eldonnombro: 1200; red. P. M. Brouwer. Enspezoj en 1932: f 1868.87, elspezoj f 1896.53.

Aktivuloj: Th. C. van Erp, Mathilde Borret, A. N. Govers, F. Knaapen, J. Pastoor, Frato M. Wynandus van Oort, A. J. v. d. Burgt, J. J. Fillot, H. Haenen, Frato Nivardus, F. G. van Hoesel, F. Smarius, P. Ch. v. d. Vijver.

Nederlanda Societo Esperantista »La Estonto Estas Nia« (»LEEN«). P. W. Baas, prez. E. de Wolf, sekr. kaj red. H. Wensel, kas. kaj adm., f-ino G. H. Benink, 2-a kas., J. V. Holleman, vicprez., E. A. Koot, 2-a sekr., P. Hendriks, J. M. Duinker, W. Grolleman, Lissauer, bibl. — Org.: »Nederlanda E-isto«, 2-semajna, 24×15 cm., 16-paĝa, 2000 ekz. Kunl.: Henr. de Lange, Mies Smith, Jan van Schoor. Membroj: ĉ. 1500; sekcioj: 31; kursanoj: ĉ. 850.

Enspezoj 1933: saldo de 1932 F. 817.47, kotizoj F. 4630.12, organo F. 496.66, prop. gazetoj F. 163.20, ekzamenoj F. 400.—, broŝuroj F. 106.87, Cseh-kurso F. 129.45, diversaj F. 101.87. Elspezoj 1933: organo F. 3768.79, gazetarservo F. 36.46, biblioteko F. 42.10, donacoj al div. or-

ganizoj F. 257.50, administro ktp. F. 433.14, prop. F. 336.52, kunveno F. 504.54, broŝuroj F. 105.63, regularo F. 20.60, diversaj F. 33.92, saldo F. 1331.44. Servoj: biblioteko (530 verk(-et)oj kaj jarkolektoj), ekspozicioj, gazetarservo, radio- kaj poŝta komisionoj, ekzamenoj. Aktivuloj: Nelly Boom, H. W. G. Cenijn, G. W. H. Cote, J. D. van den Eijnde, J. L. Mast, C. Offerhaus, M. F. Onnen, J. van Ravestein Jr., A. Rutgers, W. H. G. van Tinteren, L. W. J. K. Thomson, J. van der Velde, A. C. van der Vet, J. Vink, G. Wirix, W. Baaten, P. Hendriks, Joh. Hartog, P. Korte, W. Kunnen, L. Morean, J. Telling, S. J. Ysselstein.

Nederlanda Kristana E-Societo. H. G. van Leeuwen, prez., J. J. Wielheesen, sekr., J. D. Brakel, kas. kaj adm., H. Verburg, red. Org.: »Kristana Gazeto«, 2-semajna, 28×22 cm., 8—12-paĝa, 600 e-roj. Membroj: ĉ. 300.

Centra Esperanto-Propaganda Komisiono (Nijmegen). Starigis sin mem, estas privata entrepreno de jenaj E-istoj: A. van Weerhorst, prez., A. H. Jansen, sekr., H. de Lepper, kas., A. van Straaten, kursgvld., J. Alberda, vicprez., L. Kwak, komisaro. Servoj: skriba kurso. Partoprenantoj: ĉiujare 3—4 miloj.

Nederlanda Societo de Blindaj E-istoj. Sekr. R. Israels.

Rimarko. Por kontroligi la ĝustecon de la detaloj, la artikolo aperis antaŭe en N E-isto, 1932.

Biografio, alveninta post fermo de la unua volumo: van Dokkum, Pieter, lernejestro. Nask. 27 marto 1847 en Stadskanaal (Groningen), mortis 20 febr. 1934 en Veendam. E-isto de 1922 kaj ĝis sia morto laboris kune kun sia edzino por E. Li estas nomata la pioniro de E en Groningen. Gvidis kursojn diversloke, verkis lernolibron, 1924 (dua eld. 1931). (H. J. B.) G. P. de BRUIN

Ned Katryn: ps. de Lefebvre, v.

Nedoŝivin Aleksandr Mihajloviĉ, ruso. Nask. 14 marto 1868 en Kazanj. 27 jarojn imposta specialisto en financministerio, poste 10 jarojn adv. En 1920 transloĝigis eksterlanden kaj

en 1927 pastrigis. En 1928 fariĝis parohestro en la rusa ortodoksa preĝejo en Leipzig. E-isto de 1910. Kunfondis la ES-n en Kovno (Litv.), en Petrogrado fondis Int. E-an Komercan Cambron, kiu ricevis ankaŭ subvencion. Liajn E-an laborojn partoprenis liaj edzino (mortinta en 1926) kaj filino.

Nergaard de (nergor) Pierre Paul Ferdinand Mourier, dano, specialisto pri plantpatologio, ĝardenkultura zoologio kaj genetiko. Nask. 19 febr. 1907 en Nyborg. E-isto de 1925. Dum 1926—28 red. de »La forta voko«. En 1929 eniris la laboristan E-movadon. Faris 5-lingvan ĝardenkulturan terminaron (1200 esprimoj). Verkis »Fremdvortoj en E«. (La 15-a regulo de la fund. gramatiko en teorio kaj praktiko), 1933.

Nekrasov Nikolaj Vladimiroviĉ, ruso, ĵurnalisto. Nask. 18 dec. 1900 en Moskva. E-isto de 1915. En 1918—19 prez. de Tutruslanda Ligo de junaj E-istoj kaj red. de »Juna Mondo«, kiun li mem kompostis en la presejo. En 1922 kunfondinto de »La Nova Epoko« kaj ĝia kunredaktoro ĝis 1930. De 1923 membro de CK SEU. Li speciale okupas sin pri historio kaj kritiko de la E-literaturo, ideologio de la proleta revolucia E-movado, nacia problemoj kaj kosmoglotiko. En La Nova Epoko estas publikitaj liaj skizoj pri originala E-literaturo (Baghy, Bulthuis, Jung, Hohlov, Mihalski, Deŝkin, Schulhof ktp.) Lia kritiko eliras ĉefe el originala sociologia vidpunkto, sed samtempe li multe atentis la lingvan flankon de la verkoj. Li tradukis multajn rusajn poetojn: Puŝkin (romano »Eŭgeno Onegin«, »Kupra Rajdanto«, B'ok, »Dekdu«, »Najtingala Ĝardeno«, Balmont (»Blanka Cigno«, »La mortaj ŝipoj«), Majakovskij (»Nubo en Pantalono«, »Suno«, Gerasimov (»Monna Liza«, »Bezimenskij (»Socialismo«) kaj multajn aliajn. Sed ankaŭ li verkis multajn originalajn poemojn; la plej rimarkindaj, »Krono de sonetoj pri E«, »Fablo pri gilotinŝraŭbeto«, »Testamento de Satano«, »Verda Flamo«. En siaj poeziaj verkoj li devenas de la rusaj poetoj-simbolistoj, ĉefe Brjuŝov, kaj speciale zorgas pri la stila lingva pureco. En

1931 kunfondis IAREV. LK. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Nels Joseph, franco (de pola deveno), kontisto. Nask. 23 jan. 1894 en Warszawa. En 1912—13, fondis E-an junularan grupon de W. Post la milito, estis unu el la reorganizantoj de la Lab. G. en Paris kaj de la Fed. de la Pariza regiono, kies komitatano li estas. Kunfondis »Verdan Kanton«, kunfondis kaj prezidas la sektion de Montmartre.

Nemseĉi A. Darjuš, perso, zoroastrano, tapiŝfabrikanto kaj -komercisto. Nask. 2 aŭg. 1901 en Tabriz. Lernis E-n en 1920. Sian unuan leteron li sendis al UEA; respondo alvenis pro la tiama malregula poŝta servo kaj aliaj malfaciloj post unu jaro. De 1921 del. de UEA, de 1928 komitatano. Vizitis la UK-n en Antwerpen 1928. Fond. EG-n en T., eldonis persan lernolibron, verkis E-ŝlosilon.

Neologismo estas nomata ĉiu vorto neoficiala, ĝis sia oficialiĝo. Konforme al la libera evoluo de E, neologismon povas enkonduki ĉiu E-isto: pri la prospero de la nova vorto decidita la E-istaro, per ekuzo aŭ per ignoro. Rilate al la neologismoj kolizias du vidpunktoj inter si kontraŭaj: tiu de la simpleco kaj facileco kaj tiu de la riĉeco kaj literatura taŭgeco de la lingvo. La kolizio ŝajnas nerepacigebla, ĉar nek la propagando povas rezigni pri la granda altirforto de la facile kaj simpla, nek la literaturo pri la esprimforto kaj vortriĉo, sen kiuj vera literaturo, trondonanta ne nur la nudan penson, sed ankaŭ delikatajn nuancojn, metaforajn vort-aplikojn, duonklarajn aludojn entenatajn de vortoj, estas kaj restas nur pia revo. La problemoj ŝajnas solveblaj nur per la apartigo de la »poeziaj vortoj«, t. e. vortoj uzataj nur en la alta literaturo. Ĉi tiujn vortojn, almenaŭ provizore oni devus klarigi fine de ĉiu libro, en listo. Per tio la vulgara lingvo povus resti neembarasata de la literatura lingvo-evoluo; la poeziaj vortojn, signendajn en ĉiu vortaro per vinjeto, devus lerni nur literaturema E-isto, kaj ĉi tiun leŝnon plifaciligus, ke ĉiu verko estus klarigita eldono. Krome, devus ĉesi la

principa, kaj de kelkaj intence pliakrigata antipatio kontraŭ la poezia vortriĉo, per la rekono, ke literaturo kaj intenca vortmalriĉo estas konceptoj kontraŭdirantaj unu al la alia. Z mem estis tre tolerema kontraŭ N., li avertis sole: »ne tro krude, ne tro multe per unu fojo«. Jen kelkaj citaĵoj de li: »mi havas nenion kontraŭ la enprenado de tiuj vortoj...« (O. V. p. 245); »neologismoj... nenion ŝanĝante, nek rompante, prezentas por la lingvo nenian danĝeron« (O. V. p. 249.). »Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, danko al la reguleco de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua. Kiel la lingvo de homo matura estas multe pli riĉa kaj elasta, ol la lingvo de infano, kaj tamen la lingvo de ĝuste parolanta infano neniam diferencas de la lingvo de homo matura, tiel verko, skribita en Eantaŭ dudek kvin jaroj ne estas tiel vortoriĉa, kiel verko skribita en la nuna tempo, kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdis absolute neniam el sia valoro ankaŭ en la nuna tempo.« (O. V. paĝo 408.) »Tiu ĉi permeso (de vortkreo) estas necesa, ĉar alie la lingvo estus tro rigida kaj multajn ideojn oni tute ne povus esprimi per ĝi.« »Vi diras, ke la aperado de novaj vortoj faras la lingvon pli malfacile ellernebla. Sed kial? Ili ja tute ne elpuŝas la antaŭajn vortojn kaj ne ŝanĝas en io la ĝisnunajn principojn de la E-a vortfarado.« (O. V. p. 429.).

La principoj, laŭ kiuj la alpreno de novaj vortoj okazas, estas la jenaj:

1. Eviti, ĉe ofte uzataj vortoj, pezajn vortkunmetojn (piedpremi: treti; falpuŝiĝi: stumbli; malsupreniri: descendi; vizaĝsm. rajo: ŝminko).
2. Distingi nuancojn (fali kaj sinki; jelpi kaj boji; langvoro kaj laco; sturmi kaj ataki).
3. Signi ideojn, esprimeblajn nur per pluraj vortoj (novalo: provizore nekulturata plugtero; statisto: akcesora rolulo; kontempli: longe kaj medite rigardi; baŭmi: stariĝi sur la postaj piedoj).
4. Anstataŭigi, ĉe ofte uzataj vortoj, mal-kunmetojn (stulta: malsprita;

kvare'i; malpaci; efemera; maldaŭra; aflikti; malĝojigi; kompleksa; mal-simpla; humida; malseka; rara; mal-ofta; trista; malgaja; dura; malmola; milda; malsovaĝa).

5. Simpligi pseŭdosufiksajn vortojn (apelacio: apeli; situacio: sitiui; dekoracio: dekori; federacio: federi; erudicio: erudi; erupcio: erupti; proskripcio: proskribi). Tie ĉi oni povus menciigi ankaŭ la vortojn: dokta el doktoro; mimo el mimiko; anatomo el anatomio, beletro el beletro (istik)o, biologo el biologio; gimnasto el gimnastiko; geografo el geografio; geometro el geometrio ktp.

6. Kvankam ĝis nun ne praktikata, eble foje irota vojo estus la memstarigo de kelkaj pseŭdoafiksoj. Neergaard proponas ekzemple la sufikson ik por signi profesion (danciko, ĝardeniko, ĵurnaliko). Same oni povus el la vortoj preludo, preteksto, preskribi gajni la prefikson pre, por diri prediro, prevedo. El groteska, fosforeski, arabesko oni povus gajni la sufikson esk. (japaneska, vireska, virineska). Oni povus fari el malgraŭ la prepozicion graŭ (laŭ la volo, por la bono de...). Sed tio estas vere la »muziko de l' estonteco«.

7. Krome, per la plivastigo de E, oni certe pli kaj pli sentos la neceson de familiaraj vortoj, el kiuj oni jam proponis kelkajn en la Parnasa Gvidlibro (kaputa: rompiĝinta, ruiniĝinta; fatraso: aĉajaro; trampo: ĉifona malzorgita ulo; paŭti: malkontente silentadi; mungi: nazpurigi; maroto: amata ĉevaleto). KALOCSAY.

Neupert (najpert) Alfred, germano, instruisto popollerneja. Nask. 12 majo 1888 en Lonzig. Gvidanto de la int. E junulara movado: gvidado de TEJA 1921—31, redaktado kaj administrado de 'E Junularo', 1924—29, eldonado de varbiloj kaj lerniloj, ekz.: 'Poŝkalendareto por junaj E-istoj', 1925.

Neuzil (neujil) Albin, ĉeĥo, popollernejestro en Olomouc. Nask. 16 febr. 1883 en Bohonice. E-isto de 1904. Instruas E-n en sia lernejo de multaj jaroj laŭ propraj metodoj. Dum pluraj jaroj prez. de TAGE. Partoprenis dekunu UK-jn. Verkis: 'Metodo de manpresitaj ornamajoj', 1926. Artikoloj.

Newell (njuel) L. N. (ps. Eleno Vinfero), anglo, asekuristo. Nask. 23 dec. 1902, en London. Lernis E-n en 1916. Sekr. (1925—26) kaj vicprez. (1926—27) de Londona EK. Ĉefred. de 'Int. Language' (1925—30). Membro de administra kaj aliaj komitatoj (1926—31). Kunaranginto de UK en Oxford; ĝen. sekr. de UK en Paris; laboro por E ankaŭ en Egiptujo, 1933. Verkis: 'Concise Course in E'; 'Pres-kodo de E'. Multaj poemoj, noveloj kaj recenzoj en 'Int. Lang.', 'LM', 'HDE', k. a. Ĉefaj interesoj: la homo kaj la literaturo.

Nia ĉiutaga pano kaj ĝia influo sur la vivo de la homoj. Kompilis kaj trad. W. Trainer, 1915, 72 p., dua eld.. 1917. »Aro de interesaj pensoj, eltiritaj el la verkoj de malnovaj kaj novaj aŭtoroj. Pledado cetere lerte aranĝita por vegetarismo.« (G. S., 'E', 1920, p:191.)

Nia Gazeto. Monata eldono de »L' Éclaircur de Nice et du Sud-Est« (Francujo). Fondita febr. 1934. Dir. G. Avril, ĉefred. S. Grenkamp-Kornfeld. Formato 42×31. Ilustrita, int. revuo, bone redaktata.

Niĉo Mensogulo kaj aliaj noveloj de Bratescu-Voinesti, el la rumana trad. Morariu. 1927, 64 p. »La noveloj bele priskribas animatajn. La libro estas tre lerte tradukita.« (g.-k., La Socialisto, 1927, p: 36.)

Nienkamp Heinrich, ps. de E. Klimke, (v.).

Niستن (nisten) Johannes Petrus Leonardus, nederlandano, leŭtenantokolonelo en la armeo. Nask. 23 aŭg. 1859 en Maastricht, mortis 30 apr. 1930. Pioniro el la unuaj jaroj de E. Eŝtrano de NKEU, membro de la ekzamena komitato. Aŭtoro de lernolibro kaj prop. broŝuro.

Ni fosu nian sulkon! Devizo emfaze anoncita ĉefe de Cart kaj presita sur multajn presajojn en la jaroj post la Ido-skismo. Ĝi estis prenata el malnova franca fabelo (l. Vortoj de Cart, p: 37), laŭ kiu pli utilas uzi la ilon, ol diskuti pri ĝiaj ecoj.

Ni kantu! Kolekto de 108 hungaraj popolkantoj; laboristaj kaj E-istaj kantoj. 1928, 62 p. Traduko tre pozicia.

Nikolau Emil, rumano, oficisto. E-

isto de 1907. Estis vicprez. de RES. Verkis E-gramatikon, 1925; red. la gazeton 'E', Ploesti, 1925—27. Tradukis el la rumana al E. Kunlaboris ĉe multaj E-gazetoj.

Nikolov Georgi, bulgaro, ĝardenisto-pejzaĝisto. Nask. 7 jan. 1883 en Sofia, loĝas samloke. Kunred. de 'Unua Paŝo', 1904—1906, kaj aginto ĉefe en la unuaj jaroj de la 20-a jarcento.

Nipono. (Japanujo). Japana lingvo estas ne fleksia, sed alglua. Tial gramatiko de E estas kompare facila por japanoj, pri akuzativo neniu plendas. Nur E-vortaro kaŭzas iom da malfacileco por memori, sed tre multaj t. n. int. radikoj jam de longe eniris en J. lingvon, ekz. radio, kino, bifsteko k. a. pere de angla lingvo, kun modifita elparolo. Plie ĉiuj meze edukitaj homoj legas anglan lingvon; studentoj de altgradaj lernejoj studas germanan, francan lingvojn. Estas nedubleble, ke tia grundo helpas al facila studo de E. Sed vera internaciismo, malpotenco de J. lingvo en int. rilatoj, relativa facileco de E eĉ por needukitaj japanoj estas tri ĉefaj faktoroj de J. E-movado. Tiu dua kondiĉo estas tre propre japana, kaj kelkaj (v. K. Takahaŝi.) de patriotisma vidpunkto propagandas E-on kontraŭmetante ĝin kontraŭ angla. Tre sana kaj mirinda progreso (precipe ekonomie) de JEI estas fierinda afero. Ĝi posedas proprajn teron kaj konstruaĵon, du sekretariojn kaj unu oficistinojn, ĉiuj sufiĉe bone honorariataj. Diversaj personoj provis fondi grupojn por konkuri kun JEI sed neniu sukcesis. Post malpaco inter Parizo kaj Moskvo J. Proleta E-movado donis apogon al Moskvo. Nun subpremita. Potencaj grupoj de specialaj ideoj oficiale alprenis E-on: Oomoto kaj Kiboŝa. Iliaj E-fakoj sin tenis apud (aŭ iam kontraŭ) ĝenerala movado. Dum studentoj ludis tre gravan rolon en la movado, virinoj estas tre malmultaj. Fervojistoj grupiĝas tre fortike, utiligante senpagajn bileton kaj telefonon. Ossaka estas unu el ili. Multaj sciencaj tezoj en E, ĉefe aerologoj, kemiistoj, medicinistoj, zoologoj k. a. Radio-disaŭdigo kun 10,000 tekstoj venditaj (v.

Sindo). Atentindaj lingvaj studoj pri E pli kaj pli aperas. Sed kial nia movado ne marŝas tiel rapide kiel atendas E-istoj? La ĝenerala publiko jam komprenas ekziston de E; sed en nuna reakcia epoko, precipe post Manĉuria afero, »sanaĵ personoj« rigardas E-n kiel danĝeraĵon por la patrujo. Inteligentuloj ĝenerale ne ŝatas E-n, ĉar ĝi ne donas tujan utilecon, kompare al angla, germana, franca lingvoj. Angla estas kvazaŭ dua lingvo por japanoj. Tamen kia kompatinde mizera parol-kaj skribkapablo en angla, germana, franca lingvoj de J inteligentularo. Ili nur apenaŭ legas. Kaj ili malestimas E-n pro malriĉeco de libroj.

Rimarkinda fakto estas, ke de kelkaj jaroj progresemaj junuloj amase kuras al marksismo, sed al ili ofte malplaĉas la mildeco homaranisma de neŭtrala E-movado. Nun reakcio furiozas. Proletaj E-istoj ne havas sufiĉan potencon por kontraŭstari subpremon de la registaro. En malliberdejoj tre konsiderinda nombro da komunistoj daŭrigas aŭ komencas fervoran studon de E.

N. KAWASAKI.

A. La epoko de individua studado.

Kiu studis unua la lingvon? Respondi estas neeble. D-ro A. Oka E-istiĝis en 1891, kiam li studadis biologion en Germanujo. Li estis Volapükisto. Krom li ankoraŭ kelkaj. Ili poste aliĝis al E. (Ekz. Kentaro Simose en ĉ. 1892) En 1889 vortaron Volapük-japanan, 580 paĝan, tradukis holandano van der Heyden kaj japano Hayasi Sasaki. En 1902 franca pastro Mistler skribis pri E en iu gazeto de Nagasaki. Per tiu artikolo Kroita E-istiĝis. En 1903 Joŝino legis la artikolon de Stead en »Review of Reviews« kaj ĝin tradukis por iu kristana gazeto.

En la printempo de 1903 Mac Kenzie, skota pastro, Kanazawa, venigis lernolibron el Anglujo kaj en la somero li instigis Gauntlett, kimro, anglalingva profesoro de VI-a Nacia Kolegio, Okayama, al komuna studado. Sed G. ne konsentis, ĉar li sciis la disfalon de Volapük. Sed vizitinte M. kaj trovinte lin okupita de afer-

oj, li legis la lernolibron por distri sin en la ĝardeno. Li miris pro la facileco. Li organizis kurson en Okayama kaj en la komenco de 1906 kun la helpo de Muramoto, presejestro en tiu urbo, aranĝis faman korespondan kurson trifoje. Rezultato: 600 anoj tra Japanujo. Tio estas la komenco de praktika movado.

En 1905 Kroita skribis artikolon al gazeto »Tyokugen« redaktata de lia intima amiko Sakai. Tio ne povis doni grandan impreson al la publiko, sed kelkaj socialistoj (Sakai, Osugi, Arabatake) interesigis pri la lingvo. En majo de 1905 Kroita sendis sian prop. artikolon al taggazeto »Yomiuri« (Usui klopodis en la interno), kiu, kontraŭe al tiu de lasta jaro, vekis atenton ĉe la publiko. E. Asada, prof. de Fremdlingva Kolegio, faris elokventan paroladon en E en la lerneja ceremonio.

B. La epoko de organizita movado.

La verkinto de la »Historieto de E-a Movado en Japanujo« (japane en »La Revuo Orienta«, IX 1926) klasigis tiun ĉi epokon en kvin periodojn:

1-a periodo: ekfloro kaj velko (1906—1908)

2-a periodo: inerteco (1909—1911)

3-a periodo: mallumo (1912—1915)

4-a periodo: preparo al reviviĝo (1916—1919)

5-a periodo: reviviĝo kaj marŝo (1920—)

1. — Ekfloro kaj velko (1906—08).

En majo de 1906 Misao Katô fondis en Yokosuka »Nippon Esperanto-Societo« (Nippon E-Kyôkai). En Tokyo ankaŭ Abiko kun aliaj »Nippon E-Kyôkai«. Kroita, kiu havis intencan starigi tutjapanan potencan centran organizon, akiris la nomliston de la korespondaj kursoj de Gauntlett, dank' al la klopodo de Muramoto, leginta la artikolon de »Yomiuri«. Kaj li kunvokis la kunsidon por fondi tiun organizon 12 jun. Abiko konsentis likvidi sian societeton kaj »Japana E-ista Asocio« unuanime (dek ĉeestis) estis fondata. La Societo de Katô fariĝis la filio de la Asocio. Oficiala organo de la Asocio estas

»Japana E-isto«, kiu ekaperis en aŭg.

En julio Gauntlett donis kurson en Tôkiô. En sept. Osugi fondis en Tôkiô la Lernejon de E. (E Gakkô). En sep. Unua Japana Kongreso (tiam oni nomis ĝin Ĝenerala Kunveno de JEA) en Tôkyô. Hayasi, ministro por fremdaj aferoj, gratulsalutis. Rezolucioj, klarigitaj de Takakusu, sanskritisto: 1. En 1917 okaze de Universala Ekspozicio invitu UK-n al Japanujo. — 2. Petu al Eduka ministro, ke oni metu laŭvolan kurson de E en komercaj lernejoj. — 3. Fondu studkomitaton por plimultiĝi japanajn radikojn en E.

Unua E-libro estas en marto T. Muramoto, »A Short Vocabulary E-English and Eng.-E«. Neniuj vortoj japanaj en la teksto. Japanlingvan lernolibron verkis Futabatei Hasegava en jul. Li aŭdis E-n en Vladivostoko kaj reveninte hejmen tradukis Fundamenton de E. En 1906 8 libroj aperis. Tiel la movado ekfloris kaj ofte oni parolis pri E. Laŭ la vortoj de Chif (ĉe Z-a mortotago 1922), tiamaj gvidantoj kredis, ke ili povos konkeri tutan Japanujon post kelkaj jaroj. La nacia spirito estis forta, ĉar en tiu jaro Japanujo venkis Rusujon. Estas atentinde, ke inter unuaj pioniroj estas profesoroj (ekz. Kroita) kaj socialistoj (ekz. Osugi, Sakai). Laŭ La Revuo Orienta, sep. 1931, 17 personoj daŭre aktive batalis dum 25 jaroj. Sed tiu prospero ne daŭris longe. La Dua Japana Kongreso okazis en 1907 kaj post longa interrompo la Tria en 1916. »Japana E-isto« ĉesis eliri en 1908. Du grandaj steloj, kiujn Japanujo produktis, Chif kaj Osaka jam laboris de la komenco de tiu ĉi periodo. En 1908 Kroita vojaĝis al Eŭropo, Chif anstataŭ li zorgis pri la Asocio. Osaka en Yokosuka redaktis »Yokoska E-isto« en 1907.

2. — Inerteco (1909—11).

En 1909 Chif prunteprenis kapitalon kaj fondis novan entreprenon »Nippon E-Sya« por daŭrigi la eldonon de »Japana E-isto«. Li intencis vendi la gazeton enhavantan multajn japanajojn al Eŭropo, tiam tre prospera en la movado. Malgraŭ lia energio la gazeto ĉesis baldaŭ. En

1910 Kroita revenis. JEA eldonis »JE« en 1911 sesfoje.

3. — Mallumo (1912—15).

1912—1913 »JE« tute ne aperis. Nur hektografiitaj gazetoj »Orienta Azio« de Harada, »Orienta Stelo« de Yokosuka filio de JEA kaj rondiranta gazeto »Jokoska E-isto« (la du lastaj per la mono de Ossaka) montris, ke en Japanujo la movado ne estingiĝis. Eĉ lernolibroj elĉerpiĝis. En Yokosuka Ossaka gvidadis kursojn kaj hektografe presis lernolibrojn. En Kanazawa Erin Asai E-istiĝis kaj E-igis »la Bultenon de HEC (Hokuriku Exchange Club)«, filatelista gazeto, kaj gvidis kursojn. Iom da movado en Sakai, Hirosima kaj Tokusima; preskaŭ nenia movado en aliaj lokoj.

En 1914 »JE« reaperis. Malgranda formato, kvaronjara. K. Nakamura fariĝis vicprez. de JEA, studentoj (Ossaka, Sugiyama, en 1915 Asai) fariĝis sekretarioj. Partopreno de studentoj al la centra administrado signifis unuan paŝon al reviviĝo de la movado. En 1915 »JE« kvarpaĝa aperis dekfoje. Tiamaj laborantoj en propagando: en Tôkyô Takabatake (nuna Ooi), Oishi, en Kyusyu (poste en Tôkyô) Fukuta, en Hirosima K. Takahaŝi. En 1914 venis blinda poeto Eroŝenko el Rusujo, en 1915 fino Alexander, bahaiŝtino, el Ameriko. Akita fariĝis E-isto per Eroŝenko.

4. — Preparo al reviviĝo (1916—19).

De 1916 la redaktado de »JE« prenis sur sin Ossaka, helpite de Taiji Jamaga kaj Erin Asai. (Tial li ĉesis ĝi eldonon de Orienta Stelo.) En Yokosuka lin anstataŭis Heikiĉi Aizawa, poste Mokiĉi Kobajaŝi. De sep. en sia domo en Kanda, Tôkyô, Ossaka aranĝadis kursojn. La kursojn vizitadis en 1917 Tojosato Tooguu, E. A. Kolomeec (ukrainano), Ĉernin (rusa hebreo); en 1917 kurso en Yokohama: Hajami, Tasku Sasaki, Hazama; Nagakacu Hirano, Miĉiaki Miŝima, Ikuma Ariŝima, Ĉujoŝi Kaji (la nuna Hirokazu Kaji). La membroj de la Asocio estis 186 en aŭg. 1916, en aŭg. 1918 286, en aŭg. 1919 464. Sed la ekonomia

stato de la Asocio fariĝis pli kaj pli malbona. Tria Japana Kongreso en 1916 en Tôkyô. Kvara en 1917 en Tôkyô. Kvinna en 1918 en Tôkyô. Sesna en 1919 en Yokohama. Venis en nian tendaron tre energiaj batalantoj, en 1916 Macuzaki, en 1918 Fujisawa, en 1919 Inouye, Hasegawa, Hori, Kizaki, Ga. En 1917 venis Dick, sviso, el Rusujo kaj multe instigis japanojn. La movado fariĝis multe vigla. Sed la Asocio, malgraŭ la servado de la filo de Kroita, jam ne povis funkcii. En 1919 la presejo rifuzis la presadon de la gazeto. K. Nakamura proponis kontroli ĝi la kason de la Asocio, sed K. Kroita rifuzis. La rekonstruo de la Asocio fariĝis nepre necesa.

En la komenco Ossaka intencis reorganizi la administradon de la Asocio: transdoni la tutajn devojn al la junaj sekretarioj kiel ankaŭ respondecon de la kasadministro al ili, sed K. Kroita ne konsentis. En la letero al la sekretario Chif, el Kôbe, skribis interalie, ke estas tute vana afero reorganizi la Asocion sub Kroita kaj admonis la sekretariojn starigi tute novan prop. organizon, senigante la Asocion. Nakamura ankaŭ, rifuzante la prezidantecon de la Asocio, instigis ilin reorganizi la Asocion. Fujisawa, E. Asai, Ossaka fine decidis pri la reorganizo kaj kunvokis specialan kunvenon por tio. Fujisawa, Asai, Macuzaki, Hagiwara, Ossaka deklaris la eksigon el la sekretario kaj ankaŭ redaktanteco de J. E. kaj prezentis la projekton pri la starigo de nova prop. centro »Japana E-Instituto« kaj ĝia organo »La Revuo Orienta«. Kelkaj precipe kapitano Sôiči Ueida, esprimis bedaŭron pro la forigo de la »historia« JEA. Ossaka klarigis, ke oni lasas la Asocion ekzisti kiel moralan centron, kondiĉe ke JEI ne respondas por la financoj de JEA sed ke poste, kiam JEI prosperos finance, tiam ĝi pro la morala memvolo pagos ŝuldojn de JEA, se tiaj ekzistas. W. Oishi akcente parolas por la starigo de la tute nova JEI. T. Osida lin subtenas. La propono estis unuanime akceptata kaj ĉiuj konsentis ekzigi el la membreco de JEA kaj

aliĝi al JEI. Tiel »Japania E-Instituto« fondiĝis en la fino de 1919. En Yokohama ŝ. Hajami kaj aliaj fondis »Japania E-Komerca Korporacio.«

5. — Reviviĝo kaj marŝo (1920—).

Jus antaŭ tiu ĉi periodo aliĝis al la movado Yagi, Kawasaki, Okamoto, Ueda.

JEI fariĝis »labora centro«. Ĝi komencis eldoni la gazeton LRO en jan. Ĉiuj membroj de JEA estis rigardataj membroj de JEI. JEA tamen ne malaperis, ĝi estis lasata kiel »morala centro«, sen membroj, sen gazeto, sed kun estraro konsistanta el unu prez. kaj du vic-prez. sen sekretarioj. Do ĝi ekzistis nur laŭ nomo, kaj ne miro, ke ĝi ne povis funkcii kaj poste estis tute nezorgata. Tiu esprimo »morala centro« estas mistera. Nekompleta revolucio sekvigis en postaj jaroj ĝenajn problemojn pri la organiza afero en Japanujo. JEI estis zorgata de Ossaka. Li, fervoja inĝeniero, ĉiuvespere kaj dimanĉe dediĉis sian tutan forton al la aferoj de JEI. Li devis oferi unuan etaĝon de sia loĝejo al la oficejo. Li devis redakti la gazeton. Li devis verki lernolibron. Li devis respondi al en- kaj eksterlandaj samideanoj. JEI estas amata filo de Ossaka, al kies flegado ĝi dankas sian nunan prosperon. De la naskiĝo de JEI la movado jam ne haltis. LRO akurate eliris 12-foje aŭ eĉ pli ĉiujare ĝis nun.

Instruita de la maldolĉaj spertoj ĉe la antaŭa JEA, la nova JEI ne metis super si iajn sociajn eminentulojn kiel la estraron. Ĝi havis nek prezidanton, nek ĉefsekretarion ordonant-an. La tutan administradon prenis sur sin la egalrajtaj junaj »komitatanoj« (plejparte studentoj), efektiva laborantoj en la mastrumado. Por reprezenti la organizon por ekstera mondo, oni havis reprezentantan komitatano, elektatan por unu jaro, sed ne elekteblan por dua sinsekva jaro. Por vligi lokan movadon, preskaŭ ne ekzistantan tiutempe, JEI admonis lokajn grupojn, ke ili tro multe ne dependu de la centra JEI, sed ke ili memstare klopodu por nia afero en sia loko.

En 1920 grupoj fondiĝis en diversaj altgradaj lernejoj tra la tuta lando. Venis al Japanujo por logi multaj fremdaj samideanoj, Browne, Vaughan, Kuznecov, Serišev, Ramstedt (finna vicambasadoro) kaj ĉi tie E-istiĝis Roscoe. VII-a Kongreso en Tôkyô, kiu unuanime malaprobis la landnomon sufikson -i- pro tio, ke ĝi kaŭzas konfuzon en nia lingvo, alportante nenion utilan. Nippon: E-Sya de Osida eldonis multajn librojn verkitajn ĉefe de la komitatanoj de JEI. (JEI mem ne faris tion ĝis 1924). Ĝa importis eŭropajn eldonaĵojn (ĝis 1922) en la nomo de Orienta Librejo E-a. Ambaŭ estis kvazaŭ freŝa akvo post seka vetero, ĉar tiaj aferoj longe mankis. (En postaj jaroj inter Ga kaj Osida, inter JEI kaj Osida malpaco okazis). En la somero en Osaka, kie la movado estis de 1906, ekaperis gazeto »Verda Utopio«, dediĉanta sin al prezeito de japanaj moroj kaj traktado de sociaj problemoj. Ĝin mastrumis Fukuta.

1921. Karavano el studentoj de Imperia Universitato de Tôkyô propagandojaĝis nordorientan parton (plej necivilizitan) de la lando. VIII-a Kongreso en Tôkyô, en kiu laŭ propono de Kizaki monokolekte por fundamenta kapitalo de JEI (20 mil enoj por havi oficejon kaj oficiston) estis aprobita, sed la propono de Narita en Universala Kongreso en Praha por inviti UK-n al Japanujo estis malaprobata pro »nematureco de tempo«. Aliĝis al E-movado Ishiguro, Kozo (nun Joŝiŝi) Ŝimomura.

1922. En jan. Osaŝa faris prelegon pri lingvoj artefaritaj en la ĝenerala kunveno de Imperia Akademio. Ke kaj membroj paroladis kun aprobo. Prez. Hozumi aniĝis al JEI. Laŭ iniciato de Yanagida petskribo pri akcelo de E-instruado en lernejoj estis prezentita al Imperia Parlamento. Malsupra domo ĝin akceptis en febr. Fondo de E-Federacio de Tokiaj Studentoj. Ĉe estis 70 el 15 lernejoj. IX-a (eksterordinara) Kongreso en Tôkyô okaze de Paca Ekspozicio. Hasegawa propagandojaĝis en Koreujon. Potenca gazeto »Kaizô« malfermis kurson en

siaj paĝoj. Granda efiko al la legantaro.

En okt. X-a Kongreso en Tôkyô. Isozaki proponis monkollektion por rusaj malsatantoj. D-ro Ramstedt atentigis, ke jam pasis malsato en Rusujo eŭropa, oni devas helpi siberianojn. Kongreso esprimis tiun deziron al »Verda Utopio«, kiu jam estis komencinta tiun varbadon. Al la komuna manĝado dum la Kongreso oni invitis prof. H. E. Palmer, idisto, veninta en Japanujon por plibonigi instruadon de angla lingvo. Masamiĉi Oka kaj K. Ossaka salutis lin pro lia honoro en lia lingvo Ido, sed li mem ne povis en ĝi paroli kaj li miris (en angla lingvo) la gastamecon de japanaj E-istoj. Idista movado preskaŭ ne ekzistas en Japanujo. En nov. JEI decidis aliĝi al KR laŭ Kontrakto de Helsinki. Aperis en Kyôto J-E Vortareto longe atendita.

1923. Sekai Sityô Kenkyukai sub la gvido de Ishiguro eldonis korespondan kurson kaj E-gazeton. En marto 450 kursanoj, aranĝo de Imperia Eduka Asocio kaj JEI, helpite de taggazeto »Tôkyô Asahi« dank'al la klopodo de Tojokaua. Propagandvojaĝo al Nordorienta parto: 19,220 aŭskultis. En jul. Chif ekzigis de komitato de JEI, dirante ke JEI-estraro identigas E-ismon kun homaranismo.

En jul. en Ayabe, centro de nova religio Oomoto, okazis kurso sub gvido de Takizô Sigematu. 150 partoprenintoj inter kiuj la estro Deguĉi mem. Tio estas la komenco de Oomoto E-movado. En 31 aŭg. — 2 sep. XI-a Kongreso en Okayama. Pri laŭleĝeco de JEI Chif faris akrajn demandojn. Sciigo de tertremego en Tôkyô alvenis al la kongresanoj en la tria tago. Provizora oficejo (t. e. domo de Ossaka) kun biblioteko estis sendanĝera de la kataklismo, sed la librejo »Nippon E-Sya« estis bruligita.

1924. En jul. XII-a Kongreso en Sendai. K. Suzuki, en la nomo de privata individuo, proponis ke JEI fariĝu »morala centro«, ĉar ĝi estas efektive tia. Oni decidis, ke li rep-

renu la proponon. Chif klarigis sian jam de li antaŭ du tagoj reprenitan proponon pri ellaboro de oficiala konstanta regularo de Japana Kongreso. Li kredis, ke per tio oni povas kolekti diversspecajn E-istojn al la Kongreso. Tiel du fluoj — Suzuki kaj Chif — kontrastis. Poste aperis detala protokolo de la Kongreso.

1925. E-Propaganda Asocio fondiĝis antaŭ du jaroj sub zorgo de Oomotoanoj, ekeldonis »Verdan Mondon« (unue »Verda Globo«). En 1924 Usona delegito proponis alprenon de Lingvo Int. al la kunveno de Int. Unuiĝo de Akademioj. Imperia Akademio ricevis la demandon pri L. I. de la sekretario de la Unuiĝo. Oficiala decido ne okazis. Membroj montris sian opinion. Neceson jesis 43. Por E 24, por Ido 1, sindeteno 18. En sep. Ossaka forvojaĝis al Ameriko laŭ ordono de la registaro. Tio kaŭzis novan malfacilaĵon al JEI. Do JEI nun estis devigita lupagi por sia ejo. Speciala monkollektio por tio.

LRO-n redaktis laŭvice junaj komitatanoj. Pruvo de solidareco de JEI-anoj. En okt. Sesa Kongreso de Ekstrema Orienta Asocio por Tropika Medicino malfermiĝis en Tôkyô. Tie Ogata, Murata publikigis siajn studojn en E. En okt. XIII-a Kongreso en Kyôto. Chif ne venis. Ŝindo, fidela ano de JEI, proponis starigon de prepara komitato por ellabori oficialan konstantan regularon de Japana Kongreso. Li deziris per tio forpeli malluman maltrankvilecon regantan japanajn E-istojn. Unuanime aprobita. Prez. nomis 11 komitatanojn. (Nenia pozitiva rezultato.) Junulara Ligo naskiĝis laŭ iniciato de Isozaki, kiu volis doni novan socian direkton al la movado.

Osida eldonis ampleksan J-E vortaron de Chif kaj okaze de la kunveno pro honoro de la aŭtoro li deklaris, ke li nomos sian librejon »Nippon E-Sya« (Japana EA). Li intencis eldoni sub la kunlaboro de Chif organon gazeton kaj varbi membrojn, sed malsukcesis kaj baldaŭ li forlasis E-ujon. En Osaka grandioza kurso okazigita de tiea filio de J. Asocio por Ligo de Nacioj sub subteno de

»Osaka Asahi« kaj »Osaka Mainiti«, unuaj taggazetoj en Oriento.

1926. En febr. Kaji komencis eldoni »Junan Azion« kaj nomis sian entreprenon »Nippon E-Kai« (Japana EA), sed oni ne sciis, kiom da membroj ĝi akiris, ĉar ĝi neniam publikigis membroliston, nek kasraporton. En julio JEI fariĝis jure personigita fondajo. Tio signifas, ke JEI jam havas potencon ekonomian bazon. Tion kaŭzis la fakto, ke oni laboris por ĝi tute senpage. Nun laŭ la registara leĝo JEI estas gvidata de direktoroj kaj komitatanoj. D-ro Nakamura estis elektata kiel unua ĉefdirektoro. En sep. XIV-a Kongreso en Tôkyô. Oishi komencis eldoni raportojn de sia observatorio aerologia en E.

1927. En okt. XV-a Kongreso en Hukuoka, kie multaj univ. profesoroj estis inter samideanoj, ekz. T. Ito, Fujisaua, Ohshima. Por konsoli la viktimojn de tertremego de 1923, turo estis konstruata en sankta budaisma monto Kôyasan. Sub ĝin oni enterigis nomaron de viktimoj kune kun ĝia deveno, skribita de eksurbestro Nagata. La tekston oni tradukis en anglan kaj E-n por konservi ĝin por dek mil jaroj. En dec. JOAK (Radiostacio de Tôkyô) disaŭdigis lekcionjn de Ooi kaj Ôssaka. Eldono de gvidlibreto »Japanlando« de Fervoja Ministrejo, dank' al la klopodo de Masuzo Inouye, ministreja oficisto.

1928. XVI-a Kongreso en Osaka. Ŝindo, Niŝida, ŝibata klopodis. Unuafoje en Japana Kongreso kotizo de partopreno. La regiona registaro rigardis E-movadon kiel radikalan kaj venis multaj policanoj. E-loga Fakunsido (studo kaj klerigo de kongresanoj.) En dec. provizora oficejo de JEI transiris al pli granda domo.

1929. E-kursoj disaŭdigitaj de JOCK (Nagoya, gvidanto Ishiguro) kaj de JODK (Keizyô, gvidanto Oojama). Petskriboj al la Parlamento pri akcelo de E-instruado en lernejoj kaj pri ŝtata subvencio al JEI estis akceptitaj de malsupra kaj supra domoj. En sep. XVII-a Kongreso en Tôkyô. Unua-foje Kongresa Universitato. Samtempe en Tôkyô okazis Int. Teknika Kongreso, al kiu estis

prezentita petskribo koncerne E-n kun subskriboj de eminentaj fakuloj. Al la Kongreso Takuma Minoda kaj Kunitaro Takahaŝi prezentis prelegon pri E kaj Ossaka sian studon en E.

1930. Mortis Nakamura, ĉefdirektoro de JEI, Oishi estis elektata ĉefdir. Kiboŝa (multemembra societo por morala eduko) eldonis gazeton »Esperanto Kiboŝa« sub la gvido de Ishiguro. Ĝi poste nomis sian E-istan grupon »Nippon (Tutjapana) E-Unuigo«, kaj daŭrigis laboron ĝis 1933. XVIII-a Kongreso en Kanazawa. Prez. Segaua. En okt. ĉe JEI kreo de ĝenerala sekretario (la unua salajrata) Hirasaua. Scherer, speciala delegito de ICK, travojaĝis la tutan landon. Laŭ enketo de Sankoo E-Grupo, el 1268 aspirantoj eniri la nacian kolecion en Kyôto (Sankoo), 254 (20%) ne scias, 1014 (80%) scias pri ekzisto de E; 121 (10%) jam lernis E-n kaj 594 (41%) volas lerni E-n de nun. Laŭ raportoj senditaj de lokaj grupoj al JEI, dum la jaro okazis kursoj en 91 lokoj kun 2262 partoprenantoj.

1931. En junio Japana Prolet-E-ista Unio fondiĝis. En somero JOBK (radiostacio de Osaka) disaŭdigis lekcionjn de Ŝindo. Granda efiko. En okt. XIX-a Kongreso en Kyôto. Laŭ la registaro de JEI, lokaj grupoj nombrigas 163 tra la lando. En antaŭa duonjaro kursoj en 76 lokoj kun 1580 partoprenantoj.

1932. JEI aĉetis teron kaj konstruis el sia propra kapitalo sian propran oficejon en Hongô-motomati, Tôkyô. Nova sekretario Mijake. (Hirasaua jam ekŝiĝis pro malsano.) Radio-kurso de E, JOBK, gvidanto Ŝindo. En okt. XX-a Kongreso en Tôkyô. En labora kunsido, laŭ propono de Kyôto, studkomitato pri fondo de Centra Organizo de Japana movado naskiĝis. Sekve de Manĉuria afero naciismo fariĝis forta inter Oomoto-E-istoj, ankaŭ pli kaj pli inter neŭtraluloj. Sed JEI kurage kaj alte tenis standardon de neŭtraleco. Proleta E-movado preskaŭ sutokigiĝis pro la subpremo de la registaro. Laŭ sinregistaro en la Jarlibro de JEI, ekzistas krom JEI 4 nelokaj specialaj organizoj, 3 librejoj, 3 Fakaj Ligoj,

(Studenta, Fervoĵista, Budhana), 3 Regionaj Ligoj, 141 Lokaj Grupoj (el kiuj 50 kun sia propra organo hektografie presita; kun 2673 membroj).

1933. Kreo de ĉefsekretario (salajrata) ĉe JEI: Okamoto. JEI eldonis novan gazeton por komencantoj »E-Lernanto« kaj disvendis ĉe ordinaraĵ librovendejoj de la tuta lando. Kuraĝa provo, tamen kun bona rezultato. Inouye subskribis la Interkonsenton de Köln, do JEI partoprenis kiel landa asocio. En nov. XXI-a Kongreso en Kyōto. Ŝindo kiel sekr. de Studkomitato pri fondo de Japana Centra Organizo, raportis: al la demanda cirkulero de Ŝindo 16 anoj neis la neceson, 4 jesis la fondon (2 el ili nur pri Centra Komitato por Kongreso), 2 sindetenis. Do tia superfluaĵo malaprobita. Rezolucio kontraŭ neologismoj. Kawasaki kaj Okamoto eniris en L. K. (1932 eliris Fujisawa, restas Nišimura).

1934. En apr. XXII-a Kongreso en Nagasaki. K. Nišimura klarigis pri propono de paralela uzo de japan' kaj nipon'. La sekr. legis la disertacion senditan de Ossaka pri mallogikeco de la propono. Okamoto, Kawasaki konsentis kun Ossaka. Nišimura reprenis la proponon. Propono pri monkollekto por fabriki aeroplanon »Esperanto« kaj ĝin donaci al J. milita aŭtoritato. Post diskuto reprenita. Prezento de ĉi supraj du proponoj montris, ke naciismo tiom penetris en neŭtraĵan movadon. Propono de Ŝindo formi komisionon por prepari kongresan regularon estis akceptata. En julio en Tōkyō II-a konferenco de Tutpacifikaj Junularaj Budaistaj Asocioj, kie oni permesis paroli E-n al tiuj, kiuj ne scias japanan, anglan aŭ ĉinan lingvon.

Bibliografio (nur en E). — 1. Ooi, Mallonga Historio de E-a Movado en Japanujo. LRO, 1922. sep. okt., nov. (Efektive verkita de Ossaka. Tre detale, nur ĝis 1908.) — 2. Grenkamp, en HDE. (Efektive verkita de Ossaka. Koncize ĝis la fondo de JEI.) — 3. Kroita, La Historio de JEA. Japana E-isto, 1907. n-ro 5. (Pri la fondo de JEA.) — 4. Japana Esperantisto, organo de JEA. — 5. La Revuo Orienta, organo de JEI. —

(En ambaŭ multe da kronikoj kaj artikoloj.) — En japana lingvo ekzistas pli ampleksa historio, interesaj kritikoj.

Noto. La artikolon tralegis kaj kompletigis Kuwahara-Tosihide kaj Kenji Ossaka. N. KAWASAKI.

Japana Esperanto-Instituto esis fondita 20 dec. 1911 por antaŭtani Japanan E-istan Asocion, la ĝistiaman centron landan, kiu perdis la kapablon daŭrigi pozitivan agadon pro grava difekto en la financo kaj administrado.

En la favoraj cirkonstancoj eksteraj de la postmilitaj jaroj, JEI rapide firmigis al si la fundamenton dank' al la konvertiĝo de la preskaŭ tuta membraro de JEA kaj la sistema laboro oferita de sindona estraro konsistanta plejparte el freŝenergiaĵ junuloj kaj studentoj. Estas ne refutebla, ke sur ĉi tiuj laboroferantoj havis profundan influon spiritan la modesta, sed la plej modela gvidanto K. Ossaka per sia absoluta sinoferado.

Ĉi tiu principo oferi la laboron ankoraŭ daŭras kiel la plej elementa fundamento de la Instituto en ĉiuj fakoj, nome administrado, redaktado kaj instruado jam ne parolante propagandon. La sola escepto estas la sekretario, al kiu JEI pagas salajron de 1930.

La sana financo kaj laŭmetoda administrado estis la bazo, kiu eligis la akuratan aperigon de la ĉiunmonata organo »La Revuo Orienta« kaj la ŝparon de la bela sumo enoj 1,300.— dum tri jaroj. La regule aperanta organo multe vigligis la movadon, kaj rekompence JEI akiris pli da membroj. La ŝparita sumo per la laboroferado donis fidindan bazon, sur kiu oni aranĝis en 1922 la projekton varbi fundamentan kapitalon.

Aparte de la varbado, JEI fondis en 1924 al si la eldonfakon kun parto de la ŝparita sumo. La fako aperigis unu post alia la fundamentajn verkojn necesajn por la disvastigo, kaj la afero tiel prosperis, ke la nova fako redonis la prenitajn sumon al la administra fako kaj plie starigis al si apartan kapitalon.

En la fino de junio 1926 la kolekt-

itaj monferoj kun la procentaĵo atingis la sumon de enoj 5,353.93, la ŝparo administra 1,300.— la kapitalo de la eldonfako 2,001.84, kaj kun la necesa sumo aldonata el alia kaso, JEI sukcesis registriĝi kiel jura persono sub superrego de la Ministro de Kulturo kun celo ideala en la senco de la art. 34 de la japana civila kodo. Laŭ la statuto de JEI en la nova formo, la kapitalo de 9,500 enoj estis dividita:

Fund. kaso netuŝebla enoj 7,000.—

Fund. kaso utiligebla 2,500.—

Dank' al la prospera afero en la eldonfako kaj ĝia subfako de alilandaj E-libroj flanke de la konstanta ŝparemo en administrado kun pli ol 1,000 enoj da aktiva saldo ĉiujare, la bonhavo de JEI atingis pli ol enoj 42,000.— en la komenco de 1932. Por gardi la monsumon en la bonhavo de la influo de la inflacio, la Direktoraro de JEI decidis aĉeti teron kaj konstruigi la propran oficejon sur ĝi: la nuna oficejo inaŭguris la malfermon je la 3-a julio 1932. La jara raporto de financo en la fino de 1932 montras la konsiston de la bonhavo jene:

Fund. kaso netuŝebla enoj 11,414.63

Ce'eraĵoj 4,034.42

Stoko de la propr. eldonaĵoj 7,253.00

Stoko cetera 7,931.90

La tero en posedo 9,750.00

La konstruaĵoj 6,676.95

Mebloj kaj oficejaj iloj 503.16

(1 febr. 1934.) SINDO-Seitaro.

Statistikoj. Jen estas ciferoj, kiuj montras fidele la laŭjaran ŝanceliĝon de membraro de JEA kaj de JEI. En la sekvantaj ciferoj ankaŭ la abonantoj de »J-a E-isto« kaj de »La Revuo Orienta« estas enkalkulataj.

JEA:

1906 dec.	ĉ.	720
1909 dec.		238
Disfalo		?
1916 dec.		189
1918 dec.		286
1919 majo		464

JEI:

1920 jan.		400
1921 majo		720

1921 dec.
 | 995 |

1922 aŭg.
 | 1473 |

1923 aŭg.
 | 2351 |

1924 jan.
 ĉ. | 2700 |

1925 jan.
 ĉ. | 2300 |

1926 sep.
 | 1821 |

1927 dec.
 | 1682 |

1928 majo
 | 2159 |

1929 aŭg.
 | 2181 |

1930 jan.
 | 2079 |

1930 jul.
 | 1938 |

1931 sep.
 ĉ. | 1990 |

1932 febr.
 | 1852 |

1932 jul.
 | 1649 |

1933 jan.
 | 1495 |

1933 jul.
 | 1351 |

1934 jan.
 | 1231 |

KUWAHARA-Toshihide

Partoprenintoj en J. E-kongresoj:

1. 1906 (Tōkyō) (?)
2. 1907 (Tōkyō) ĉ. 300
3. 1916 (Tōkyō) ĉ. 50
4. 1917 (Tōkyō) ĉ. 50
5. 1918 (Tōkyō) ĉ. 60
6. 1919 (Yokohama) ĉ. 60
7. 1920 (Tōkyō) ĉ. 40
8. 1921 (Tōkyō) ĉ. 100
9. 1922 (Tōkyō) ĉ. 60
10. 1922 (Tōkyō) ĉ. 170
11. 1923 (Okayama) ĉ. 150
12. 1924 (Sendai) ĉ. 100
13. 1925 (Kyōto) ĉ. 150
14. 1926 (Tōkyō) ĉ. 200
15. 1927 (Hukuoka) ĉ. 250
16. 1928 (Osaka) 129
17. 1929 (Tōkyō) 280
18. 1930 (Kanazawa) ĉ. 100
19. 1931 (Kyōto) 281
20. 1932 (Tōkyō) 366
21. 1933 (Kyōto) 236
22. 1934 (Nagasaki) 112

MIJAKE, KAWASAKI, OKAMOTO.

UEA. Antaŭ la fondiĝo de JEI (1919) ekzistis kelkaj delegitoj en kelkaj urboj kaj provincoj, sed ili estis ne en fortika interrilato. La estaro de JEI estis simpatia ne al Genevo, sed al Parizo (pro landnoma sufikso, pro neoficialeco de UEA k. a.). Tial eĉ per fervora propagando de unua ĉefdelegito Ga la multiĝo de la delegitoj ne estis rapida, kvankam la nombro de la membroj iom kreskis. Ĉefdelegitoj poste: Yagi, Ishiguro, (nun Fujisaua). Post la reorganizo de

UEA la situacio ŝanĝiĝis, nun JEI sincere klopodas plivastigon de delegita reto. — (Kaw.)

Fakaj Organizoj. 1) Japana E-ista Ligo Fervoĵista: propagando kaj praktiko de E inter fervoĵistoj. Lastatempe tre vigliĝis. Organo: La Fervoĵisto (monate). 11 grupoj kaj 251 anoj. Fondita en okt. 1931. — (Antaŭe, jam en 1920 ekzistis Japana Fervoĵista E-Unuiĝo.) 2) Japana Budhana Ligo E-ista: propagando de B-ismo per E kaj de E al B-istoj. Organoj: La Lumo Orienta (kvarfoje jare), Informilo (laŭbezono). 120 anoj. Fondita en majo 1931. — 3) Japana E Literatura Societo: studo de E-literaturo, diskonigo de J-a literaturo per E, poluro de lingva tekniko de E. Organo: E-a Literaturo (dumonate). 150 abonantoj. Fondita en okt. 1932. — 4) Japana Prolet-E-ista Unio: propagando kaj praktiko de E por laboristoj. Antaŭe kun organoj: Informilo de JPEU kaj Kamarado (monata). Nun sufokiĝis. Fondita en jan. 1931. — 5) Japana Studenta Ligo E-ista. Organo: Bulteno. Jarkunveno okaze de la J E-Kongreso. Fondita en okt. 1931. — (Kuw.)

Sciencistoj. Multaj sciencistoj favoras E-n. Multaj el ili ne lernas persone E-n por publikigi sian studon, pro la supozo, ke eksterlandaj samfakistoj ne povos legi ĝin. Ekzistas multaj, kiuj volonte skribos E-e, kiam eŭropaj kaj usonaj gazetoj nur akceptos artikolojn verkitajn en E, eĉ se ili aperigos la artikolojn en nacilingva traduko. Kelkaj gravaj gazetoj, ekz. tiu de industria kemio, mekanika tekniko k. a., akceptas artikolojn en E. Jen estas eminentaj nomoj de sciencistoj-favorantoj: INOUE-Zinkiti, Kotaro HONDA Turuiti HAYASI, Otogorô MIYAGI, ĉiuj prof. de Tôhoku Imperia Univ., unuaj du ekxa kaj nuna rektoroj; Gen'itsu KITA, prof. de IU de Kyôto, Bunnroku ARAKAWA, prof. de IU de Kyusyu. Grupo de specialistoj (ekskluzive de la multaj studentaj E-grupoj en universitatoj): Hermesa Rondeto, Scienca Rondeto (grupo de biologoj kaj aliaj en Tôkyô), Elektro E-Grupo (kelkaj elektristoj en Tôkyô kunvenas ĉiumonate de 1934). UEA

mem havas diversajn fakajn delegitojn. — (Kuw.)

Studenta Grupo. En J E-movado studentoj ludis rimarkindan rolon. En 1914, kiam la movado estis ankoraŭ malforta, studentoj en Imperia Universitato de Tôkyô fariĝis sekretarioj de JEA (K. Oosaka, R. Sugiyama, en 1915 E. Asai) kaj dank' al ili la movado iom post iom plivigliĝis. En 1915 ili fondis en sia universitato studentan E-grupon kredeble la unuan. — Post fondo de JEI en 1920, studentoj fariĝis la centro de la movado. En multaj universitatoj kaj kolegioj fondiĝis studentaj grupoj kaj okazis ekspozicioj, kursoj sub ilia gvido kaj naskiĝis multaj junaj laborantoj. Multaj el la studentaj grupoj havis nenian gvidanton inter la profesoroj, kaj studentoj pli-malpli spertaj instruis la lingvon al pli novaj kaj tiel daŭrigis grupan agadon. Ekz. Sankoo E-a Grupo en Tria Nacia Kolegio, Kyôto, agadas seninterrompe jam 15 jarojn kun neniu profesoro-gvidanto. Ĝi eldonadas trifoje jare hektografie presitan organon »Libero« (en jun. 1934 la 39-an n-ro), okazigas ekspoziciojn, kursojn, oratoran kunvenon en E ktp., kaj en 1922 kompilis la unuan J-E vortaron kaj en 1928 ricevis oficialan rekonon kaj ekonomian subtenon de la lernejo. — En okt. 1931 fondiĝis Japana Studenta Ligo E-ista, kiu havas jarkunvenon okaze de la J-E Kongreso. Organo: Bulteno. Lastatempe ne funkcias tiel vigle, kiel antaŭe. — (Kuw.)

Medicinistoj. Joŝicugu Okamoto kaj Koozoo Ueda, studentoj en Farmacia Fakto de Medicina Fakultato de Imperia Universitato de Tôkyô, okazigis kurson en 1921 por medicinistoj kaj farmaciistoj. Tio estas unua paŝo de E-movado en med. rondo. En 1922 Masataka Murata kaj Hisao Kasai publikigis siajn studojn en E. Ili estas la unuaj med. tezoj en J-ujo originale verkitaj en E. En 1923 fondiĝis en la dirita Med. Fakultato EK »Eskulapida Klubo« (unue »Hipokratida Klubo«) kaj per konstanta agado de tiu Klubo E dissemiĝis en aliaj med. kolegioj, kaj aperis multaj med. tezoj tute en E aŭ kun resumo en E. En 1925 en Sesa Kongreso de

Ekstrema Orienta Asocio por Tropika Medicino Ogata kaj Murata publikigis siajn studojn en E. En 1926 fondiĝis Japana E-a Medicina Asocio kun prof. Seiho Nishi kiel prez. Prof. Ogata donacis al JEMA 500 enojn kiujn li ricevis de Imperia Akademio kiel premion por lia en nenta studo pri rizmalsano. Eskulapida Klubo okazigis Somerajn Hejmojn en 1925, 1926, 1927, 1928 kaj Foliaro-Klubo (EK en Medicina Fakultato de Tiba) en 1929. Sed nun JEMA ne laboras kiel antaŭe. Nun prof. Nishi donas E-resumon al ĉiu kajero de med. revuo de si redaktata. Ryōzi Ura laboras konstante kiel landa kasisto de TEKA. Eldoniĝis jarlibroj de JEMA por 1926 kaj 1927. Farmaciistoj kaj medicinistoj registritaj: 276 por 1926, 697 por 1927. — (Kuw.)

Farmaciistoj. Farmaciaj studentoj instigis E-movadon en med. rondo en 1921. En 1926 kvin farmaciistoj (Okamoto, Hadano, Hikutomi, Mikumo, kaj Yamada) fondis farmacian E-grupon »Hermesa Rondeto« kaj kompilis Leksikonon de Kemo kaj Farmacio J-E (1-a vol. Kemia terminaro kaj nomenklaturaro, 2-a vol. Nomoj de drogoj ordigitaj laŭ botanika klasifiko, Nomoj de Medikamentoj kaj Drogoj laŭ Japana Farmakopeo, 3-a vol. Nomo de Drogoj kaj Kreskajoj.). En 1930 sur bazo de la 2-a vol. eldoniĝis en bela libroformo »Seslingva Vortareto de Medikamentoj laŭ Japana Farmakopeo.« — (Kuw.)

Fervojistoj. Jam en 1920 fondiĝis J. Fervojista E-Unuiĝo sub iniciato de T. Tomita. Okazigis prop. kunvenon, kurson. En 1931 okaze de JE-Kongreso fondiĝis J. E-ista Ligo Fervojista konsistanta el laborantoj en Ŝtatejoj. En J-ujo ŝtatejoj povas senpage veturi tra la lando kaj utiligi longadistanca telefonon fervojan. Kun tiaj du unikaj bataliloj, JELF rapide kreskis kaj nun havas viglajn fervojistajn E-grupojn en 11 lokoj kaj 251 membrojn. Organo de JELF: La Fervojisto. Multaj lokaj grupoj ankaŭ havas sian propran organon. Liga ĉefsekr. Kakutarō Tanaka. Konsilantoj: eminentaj fervojistoj. — (Kuw.)

Militistoj. En 1906 K. Oosaka, tiam arma kadeto, propagandis E-n en milithaveno Yokosuka. En 1912 G. Makise, prof. de Arma Akademio, partoprenis en 8-a UK en Kraków. En 1923 Matuba-K. donis kurson en Mar-armea Subingeneria Lernejo en Yokosuka, kaj estis kelkaj kursoj de aliaj en sekvintaj jaroj. Lastatempe E-movado estas malvigla inter J militistoj. De kiam J-ujo eliris el Ligo de Nacioj, la vorto »internacia« ne sonas agrable precipe inter ili. Oni havas nenium E-societon inter militistoj. E-istoj: Suekiĉi Hagino, leŭtenanto-generalo; Tami Kimata, generalmajoro; Sōiĉi Uĉida, generalmajoro; Makoto Aŭaja, komandoro; Masami Katoh (v.), majoro-aviadisto; Joŝiŭĝi Oba (v.), leŭtenanto-komandoro, Arata Kuŭajamat, leŭtenanto, ŝipestro; Joŝimasa Ikeda, mil. kuracisto. — (MUNETIKA-Sintyō.)

Blinduloj. E estis instruata kiel oficiala kurso en Urba Blindula Lernejo de Oosaka de 1925 ĝis 1930 kaj poste kiel laŭvola kurso. En aŭg. 1927 speciala kongreso de B-uloj E-istoj havis lokon en Oosaka, kaj, laŭ ĝia decido, en apr. 1928 Takeo Iwahashi, Sindō-Takesi, Hata-Mituto, Torii-Atuzirō, Nakamura-Kyōtarō, ĉefred, de brajla ĵurnalo »Tenzi Mainiti«, k. a. fondis J-an Asocion de Blindaj E-istoj (JABE), kies sekretariejo sidas en la dirita lernejo. Membroj: ĉ. 60. Aparte de JABE, kies movadcentron formas ĉefe kristanoj, en 1927 Ueda-Zyunzō fondis en Kyūsyū Societon de Budaisma Blindula E-isto. Jam en 1923 blinduloj havis fakkunsidon en 11-a J E-Kongreso en Okayama. La blinduloj-instruistoj favoras E-n preskaŭ senescepte. Eldonaĵoj en brajla alfabeto: 4 lernolibroj de E kaj po 1 E-J kaj J-E Vortaro. Aŭtoroj: Torii, Nakaniŝi, Kisimoto-Zyūtarō. Krom la menciitaj eminenta B-E-isto: Kumagai-Tetutarō, pastro. — (Kuw.)

Sciencaj tezoj. En J-ujo kompare multaj sciencistoj aperigis siajn studojn en E. En medicina rondo tion iniciatis en 1922 Murata per »La plej simpla metodo por serodiagnozo de sifiliso« kaj sekvis la modelon Kasai, Nishi, Ogata, Yagi, Huzinami, kaj

multaj aliaj. En kemia rondo en 1926 Maeda per »La konsisto de magnezio-oksiklorida cemento« kaj sekvis lin Sakurada, Tutiya, Yamane, Syōzi, Yamamoto k. a. En meteorologia rondo de 1926 Oishi eldonadas la ampleksajn raportojn en E. Ankaŭ pri aliaj sciencbranĉoj aperis pluraj raportoj en E, ekz. pri Marstelo de Ohshima en 1929, pri Diferencialaj kvacioj de Fukuhara en 1930, pri zoologio Kawamoto, pri botaniko Fukui, k. m. a. La junia n-ro de LRO, 1930, estis dediĉita kiel sciencia n-ro kaj enhavas liston de ĝis nun eldonitaj sciencaj dokumentoj kaj de manuskriptoj ankoraŭ ne eldonitaj. (Kuw.)

E d u k o. En febr. 1922 en la Domo de Deputitoj estis akceptita petskribo pri enkonduko de E en lernejon, prezentita laŭ instigo de Kunio Janagida. Samspecaj petskriboj en sekvantaj jaroj. En 1927 petskribo, ke registaro senprokraste komencu esploron por enkonduko de E en lernejon. Ĉiuj akceptitaj, sed sen efektiva rezultato. En 1931 Takeuĉi proponis al 19-a J E-Kongreso kompili lernolibron de E por elementa lernejo kaj en 1932 je ĝia komisiio li ellaboris legolibron. E estas instruata oficiale en 5 lernejoj kiel deviga kurso. J-a traduko de raporto pri E de la sekretario de Ligo de Nacioj, 1923, bone propagandis. 1923 Int. Eduka Asocio (J-a) eldonis libron »Teorio kaj praktiko de int. eduko«, sur kiu el 26 eminentaj pedagogoj 3 akcentis bezonon de E kiel fundamento de int. eduko. 1923 Joŝikacu Ŝibata verkis »Eduko kaj E« (160 p.). En 1932 en gazeto »Pedagogio« oni diskutis pri »enkonduko de E en viron liceon anstataŭ angla lingvo«, propono de Marujama. Du subtenis, tri kontraŭis kaj kvar sin detenis. En 1933 Imperia Asocio por Infaneduko eldonis gazeton »La Infanaro« kun 10-paĝa E-kroniko sed por nur duonjaro. — (S. Kubo.)

Religio. Generala aspekto. En ŝtataj lernejoj prediko de religio estas malpermesata. Tion necesigas la ŝtata politiko, ke super imperiestra familio estu nenio sankta. Plej parto de la nunaj J junuloj ne havas religian

kredon. Budaismo, ludinta gravan rolon en malnova tempo, havas grandan kredantaron precipe inter maljunuloj. Kristanismo, importinta okcidentan civilizon, ne estas potenca. Ŝintoismo estas dividata en du formojn: ŝtata rito kaj popularaj sektoj. Al la lasta apartenas Tenrikyō. Oomoto, Ittōen, Hitonomiti estas tri el la novaj religioj aŭ religiaj movadoj. En lasta tempo kelkaj budaistoj (v. Sibajama) utiligas E-n, sed malmultaj kristanoj (v. Kajaba) atentis pri E. Oficialan alprenon faris nur Oomoto. (v.) Iam oni provis enkonduki E-n en Tenrikyō, sed sen aktiva rezultato. En Ittōen spirito de E estas tre respektata kaj en la komenco de la organa gazeto oni vidas E-tradukon de ĝia devizo. — (Kaw.) — **B a h a i s m o.** F-ino Alexander propagandis ĝin en Tōkyō kaj ĉirkaŭ ŝi kolektis kelkaj E-istoj. Ŝi eldonis »Kaŝitajn Vortojn de Bahau'la« (v. Alexander, Aibara). — (Kaw.) — **B u d a i s m o.** Instigite de la fondo de Budhana Ligo E-ista (en Anglujo), J Budhana Ligo E-ista estis fondita 12 jun. 1931 de F. Dazai, Ŝ. Inada, J. Mononobe, K. Sibajama. Unua ĝenerala kunsido en Kioto, 15 okt., kun pli ol 40 partoprenantoj, el kiuj nur malpli ol 8 komprenis E-n. La energia agitado de la Ligo per la bela gazeto multe propagandis E-n al B-anoj. En 1933 Junula Ligo de Proletaj B-istoj (en Tokio) starigis E-fakon kaj en maj. 1934 presis en E. en sia literatura gazeto »AKA« unuan saluttleteron al »Buddhist Lodge« 2-a Tutpacifika Konferenco de Budajmaj Junularaj Ligoj kun E kiel unu el uzlingvoj, 18–21 jul. 1934. Bibliografio de B-ismo en LRO, jul. 1934. — (Takeuĉi-T.). — Pri Oomoto v. apartan artikolon.

K i b o ŝ a. Morala societo fondita de Seikoo Gotoo en 1918. Predikante sentimentalan amison, kolektis pli ol milionon da membroj, de kiuj plejparto estis sinceraj sed naivaj knabinoj, junulinoj. En 1930 enkondukis E-n kaj eldonis E-gazetojn. Nur al E-afero helpis E-istoj Ishiguro, Kurachi, Simomura, Taŝiro k. a. En la nomo de »Nippon E-ista Unio« Gotoo ĉestis al 22-a UK en Oxtord

1930; Takeuči sendis riproĉleteron al UK, malkovrante la pseŭdecon de la organizo. La ĝenerala afero, de Kiboŝa marŝis kaj fariĝis granda potenco, ricevinte eĉ subvencion de la registaro, kaj ludis reaktion rOLON kontraŭ socia progreso. Fine, en 1933 japana jura aŭtoritato arestis Gotoo kaj lia malhonesteco pri financoj de Kiboŝa, lia malmorala konduto malkovriĝis. Kiboŝa baldaŭ distalis, ĉar la membroj elreviĝis pro hipokriteco kaj ekspluatemo de la iam tiom adorita gvidanto. »E-Kiboŝa« ankaŭ ĉesis 1933 jul. — (Kaw.)

Muziko. Same kiel pri aliaj formoj de belarto ankaŭ pri muziko ni vidas japanan kaj eŭropan en J-ujo. Tamen ĝenerala kapablo por muziko estas malalta ĉe multaj J-oj. E-aj gazetoj, kiel ekz. La Revuo Orienta, E-Lernanto ofte aperigas kantojn lastatempe. Du famaj muzikistoj estas E-istoj: Kōsaku Yamada kaj Takashi Iba. Yamada lernis E-n de sia bofrato Gauntlett jam tre frutempe. Iba parolis en E post septaga studo, interalie, ĉar E havas bonajn sonojn por kantoteksto. (v. La Revuo Orienta, jan. 1929). — (KAWAMURA-Sin'itirō).

Stenografio. Por J-a lingvo ekzistas tre multe da sistemoj, el kiuj nur la famaj sin kalkulas dekelkaj. En 1882 Tagusari-Kōki (nomata ankaŭ Minamoto-Kōki) elpensis la unuan sisteman stenografion por J lingvo, dank' al kiu de la unua parlamento (1890) oni havas fierindan aŭtentikan dokumentaron per stenografio. Li estis tre fervora E-isto. En 1899 G. E. Gauntlett, eldonanto de la unua koresponda E-kurso en J-ujo, enkondukis sistemon de Pitman al J-a lingvo. Mori-Takumei, ĉefo de S. Instituto de Kyōto, eldonas de 1925 monatan gazeton kun E-titolo »Studo Stenografica«, kaj propagandas E-n al S-istoj. Li ricevis en 1931 arĝentan medalon de Int. Asocio de E-istoj-S-istoj pro apliko de sia Nakane-sistemo al E. En 1931 Oobaitaru, E-isto, fondis J. Asocion de Intersteno kaj eldonis libron, gazeton. — (MATUDA-K.).

Radio. Neniu radio-stacio disaudigas la programon E-e. Nur okaze

oni havas paroladojn pri aŭ per E (ĝis nun ĉ. 40 fojojn, plejofte ĉe JOCK, Nagoya) kaj de tempo al tempo daŭran kurson de E (12 fojoj; plej sukcesa estis tiu de Ŝindo (v.) ĉe JOBK, Oosaka. En nov. 1926 E. Takagiŝi, tiama ĉefdir. de Hiraso Laboratorio de Elektra Ekzamenfako de Ministrejo por Poŝtaj Aferoj, alparolis E-e al radio-amatoroj ĉefe en Usono per mallongonda radio-sendilo. E en gazetoj: »La Radio kaj Eksperimento«, monata gazeto kun 50,000 abonantoj, enhavis E-kurson por 1929—31; »La Ohm«, monata gazeto pri elektro kun pli ol 50,000 abonantoj, havas E-kolonon de 1931 ĝis nun. — KUWAHARA-Th. kaj Ĉ. JUL.)

Febr. 11—Marto 5 1925 Takao en ĵurnalo Asahi aranĝis la unuan E-an programon je la okazo de la Radio-Ekspozicio, Osaka. Ĝi konsistis el kantoj, ĥoroj kaj la speciala saluto per E al la radiostacio en Ŝanhajo. La 1-an pri-E-an paroladon en la oficiala disaŭdigo faris prof. Fujisaiŝa, de JOAK, Tokio, Aŭg. 30 1925. Z-an naskiĝtagon festis la unua JOBK, Osaka, Dec. 15 1925 per kantoj kaj pri-E-a parolado. La unuan E-kurson okazigis JOAK, Dairen, Febr. 8. 1926 sub la gvido de Obana. La sukceso de la kurso de JOCK, Nagoja, Sep. 20-29 1927 kaj la bonega parolado de prof. Niŝi okaze de la XIV-a Japana Kongreso Sep. 25 Tokio rezultigis malfermon de la grandskala kurso de JOAK, Tokio, Dec. 13-25, 1927, konsistanta el 12 lecionoj po 30 m. de 18.30 ĉiŭespere sub la gvido de Ooi kaj Oosaka; 15,000 lernolibretoj speciale redaktitaj por ĝi elvendiĝis. La paroladoj de ICK-delegito Scherer 1930 (Okt. 8 JOAK Tokio; Okt. 18 JOHK, Sendai; Okt. 30 JOBK Osaka) forte influis la publikon. En 1931 de Jul. 20 ĝis Aŭg. 31, JOBK Osaka okazigis ĉiumateman kurson kun 37 lecionoj po 30 m. escepte dimanĉon sub la gvido de Ŝindo; ĝin relajis JOFK en Hiroŝima kaj JOKK en Okajama kaj la tuta duono okcidenta de Japanujo ĝin aŭskultis; 20,000 lernolibretoj disvendiĝis. La 2-an kurson de JOBK, 29 lecionoj po 30 m. de la 6.30 ĉiumatene Aŭg. 16—Sep. 17. 1932, relajis JOOK, Kioto; JOKK,

Okajama; JOHK, Sendai; JOUK, Akita; JOFK, Hiroŝima; JOTK, Macue; JORK, Kooĉi; JOGK, Kumamoto; JOLK, Fukuoka; kaj JOSK, Kokura, tiel ke preskaŭ la tuta lando povis ĝin aŭskulti per kristala ricevilo. La unuan fojon en la Japana Radio-historio la JOBK-kursoj okazigis diktekzamenon por aŭskultantoj kun granda sukceso kaj bona rezultato, kio pruvas, ke E estas plej klare aŭdebla per radio. Prilingvaj k. c. demandoj dum kaj post la kurso atingis la sumon de 378 kartoj kaj leteroj, dum tiuj de la kursoj de angla lingvo, senĉese daŭrigata la tutan jaron dum 7 jaroj atingis nur ne pli ol 800 (meznombre 114 jare). En Formoso la radio-afero estas sub la direktado de la eduka aŭtoritato. Sano Sugimoto siatempe estris ĝin, kaj ankoraŭ nun lokaj E-istoj havas grandan influon. Sekve la stacio JFAK en Taihoku ĉiam havas ampleksan E-programon; precipe notindaj estas E-teatraĵoj ĝiaj de Dec. 15. 1930 kaj Dec. 15. 1931. Sume ĝis la fino de 1932 19 japanaj stacioj disaŭdigis: 14 per E, 33 pri E, kaj 11 kursojn. — (SINDO-Seitarō.)

Proleta movado. 1906 Hasegawa-Futabatei, granda japana literaturisto, kiu verkis unuan japanan lernolibron de E »Mondlingvo«, estis progreseme pensanta kaj socialisma. JEA, fondita en tiu ĉi jaro, havis kiel siajn membrojn Osugi-Ei, Sakai-Tosihiko k. a. famajn gvidantojn de tiama socialista movado japana. E-Lernejo de socialistoj Osugi-Ei. E-istoj-socialistoj interligiĝis kun la »Int. Socia Revuo«.

1921. La grupo »la Semanto«, la unua proleta verkista rondo en Japanujo, havis kiel siajn membrojn Akita-Ujaku, Sasaki-Takamaru k. a. E-istojn. Fukuta-Kunitaro, anarĥisto kaj malnova E-isto, eldonis en Osaka monatan gazeton »Verda Utopio«.

1923. E-rubriko en la anarĥista organo »Laborista Movado«. Ankaŭ multiĝas anoj de SAT.

1924. Fakkunsido de SAT-anoj je la okazo de XII-a Japana E-Kongreso en Sendai.

1925. Fakkunsido de SAT-anoj je la okazo de XIII-a Kongreso en Kio-

to. Fondiĝo de E-ista Junula Ligo sub influo de marksista movado inter la studentoj. La Ligo ekzistadis en la daŭro de ĉ. 1/2 jaro.

1926. Fondiĝo de Kaŝiŭagi-rondo en Tokio de 17 Tokiaj SAT-anoj.

1928. Fondiĝo de E-ista Kultura Asocio, kiu ĉefe studis teorion de E sur la starpunkto de historia materialismo. (Organo: Revuo Kultura.)

1929. Somera E-Kurso de l' Instituto por Int. Kulturo (antaŭiranto de l' Instituto por Scienco Proleta) havis grandan sukceson. Kursanoj fondas »Ruĝan Rondon«, paralele al Kaŝiŭagi Rondo. Fakkunsido de SAT-anoj je la okazo de XVII-a. Kongreso en Tokio. En nov. fondiĝo de l' Instituto por Scienco Proleta kun Studgrupo por E.

1930. Eldonado de Resumfolio E-a de l' organo »Scienco Proleta«. En jul. kursanoj de E-kursoj de la Instituto por Scienco Proleta fondas Prolet-E-istan Asocion en Tokio. En aŭtuno komenciĝas eldonado de »Proleta Kurso de E« (6 vol.) kompilita de Studgrupo de E de l' Instituto por Scienco Proleta. Salte progresas proleta E-movado kaŭze de tiu ĉi eldonado.

1931. En jan. fondiĝo de l' tutjapana organizo, Japana Prolet-E-ista Unio (JPEU), kun ĉ. 150 membroj. Filioj en Osaka, Kioto, Kobe, Okajama ktp. Akita-Ujaku fariĝas prez.; Monata organo »Proleta E-isto«. En aŭg. JPEU aliĝas al Int. Unuiga Komitato de Klasbatalaj LEA (IUK). En okt. la organo de JPEU ŝanĝas sian nomon »Kamarado«.

1932. En febr. JPEU komencas eldoni monate »Informilo de JPEU«. En marto II-a Kongreso de JPEU en Tokio. JPEU havas pli ol 10 filiojn kaj 300 membrojn. Legantoj de »Kamarado« kalkuliĝas ne malpli ol 2000.

MARKS MUTO.

Japana proleta E-movado apogas sin ĉefe je inteligentularo, de komenco ĝis lasta tempo. Tion kaŭzas relative granda pezo de la inteligentularo en la proleta movado kaj lingva malfacileco de E por laboristoj parolantaj gepatran lingvon kun tute fremda strukturo al E eŭropdevena. Inter pioniroj de E-movado sin trovas suf-

iĉe da socialistoj. Tamen proleta E-movado marksista ekvigliĝis ĉ. 1929, kiam en la lando proleta kultura movado komencis sian viglan ekpaŝon influite de akriĝo de sociaj situacioj kaj leviĝo de revoluciaj laborist-kampanaj movadoj. En 1931 la movado organiziĝis en tutlanda skalo en formo de JPEU kaj disvolviĝis en ĉiuj kampoj altirante al si laboristojn en sufiĉa grado. En 1932 la II-a kongreso de JPEU okazis, sed publike malpermesita. Okazis milito en Manĉurio kaj faŝisma tendenco regis la landon, subpremo al proleta kultura movado fortiĝis. Publikaj laboroj de JPEU malfaciliĝis. En 1933 KOPF, centra organizo de proleta kultura movado, estis kvazaŭ malleĝigita. Al JPEU ankaŭ nebligis funkcii antaŭ publiko kaj proleta E-movado japana revenis al la stato antaŭ fondiĝo de JPEU. Aldonita de A-A.

Virina grupo: Klara Rondeto. 12 apr. 1925 Sadano Jajima (nuna Hirakaŭa) kaj aliaj kvin japaninoj kiuj tiam lernadis E-n ĉe Macue Morita (nuna Sasaki) nomis sian grupeton Klara Rondeto laŭ Klara Zamenhof. Ĉi tiu eta rondo fondiĝis por pliforte unuiĝi por studado de E kaj ĝia propagando speciale inter virinoj. Ili regule kunsidis por studado; Morita kaj Jajima gvidis E-laborem diversloke kiam ili havis bonan okazon. Multaj malfacilaĵoj, kiuj preskaŭ neeviteble akompanas japanan virinseksan herede kaj socie, estas ĉiam malhelpo al la progreso de virinoj ĉiuflanke. Mense kaj materie nur malmultaj japaninoj havas sian memstarecon kaj liberecon. La rondetanoj regule kunsidis ĉe M. Sasaki: de la komenco la Rondeto neniam havis kaj havas sian prezidantinon nek sekretarion, kies taskon ili laŭvice prenas sur sin. La rondo estas ĉiam malforta kaj eta, sed ĉiam daŭrigas sian modestan semadon inter japaninoj. (v. M. Sasaki, I. Kurijama.)

MACUE SASAKI †

Krom la ĵus nomita funkcias virina E-grupo en Yokohama (Rondo Amikino) kaj en Osaka (Orkidaro).

Lernejo. Kelkaj E-istoj okazigis

kurson de E sub nomo de »E-Lernejo«. La Lernejo de la Lingvo E (E-go Gakkō), fondita 17 sep. 1906 de E. Osugi sub aŭspicio de JEA, donis tri kursojn ĝis la likvido en apr. 1907 kaj edukis fruatempajn batalantojn. En 1922 Akiyama-Bun'yo donis kelkfoje kursojn sub nomo »Nippon E-Gakuin«. En 1926 Osida-Tokurō okazigis periode kursojn sub nomo »Tōkyō E-Gakkō«. En 1931 Hirokazu Kaji donis kursojn sub nomo »Nippon E-Gakkō«. Ili estas efektive ordinaraĵoj kursoj. — Kiel oficiala deviga kurso, E estas instruata en jenaj lernejoj: Urba Blindula Lernejo de Oosaka (fondita de la komunumo), Kihoku Gissen Knabina Liceo, Produktiva Gimnazio (ambaŭ fonditaj de s-ano Tomeki Kobajaŝi), Kinrō Knabina Liceo, Nippon Presarta Lernejo (ambaŭ fonditaj de kultura scienceto Kiboŝa). Kiel laŭvola kurso, en Fremdlingva Kolegio de Tōkyō en 1906 kun 200 lernantoj kaj oficiale en Medicina Fakultato de Nagasaki. Kiel laŭvola kurso sekrete (sub preteksto instrui anglan lingvon) en iu Elementa Lernejo, 1934. Kursoj kun fiksitaj honorario al la gvidanto en Athéné Français kaj Knabina Fremdlingva Kolegio de Tōkyō. — Privataj liberaj kursoj de E estas donataj en multaj altgradaj lernejoj tra J-ujo, sub aŭspicio de E-grupoj en ili. — (Kuw.)

Instrumento. Gramatika metodo estas ŝatata ĝenerale. Japana karakterizado. Ossaka publikigis multajn prilingvajn artikolojn kun detalaj komentarioj en Japana E-isto, LRO, kaj ankaŭ multaj aliaj. Sed jam 1919 Asai, 1920 Kuznecov instruis per rekta metodo. Malgraŭ la historia gramatika metodo, 1932 lusaŝita pledis por parola metodo per multaj artikoloj kaj fondis studgrupon de instrumento. Korespondan kurson iniciatis kimro Gauntlett en 1906 kaj per tio diskonigis E-on. En 1922 Asai instruis per korespondo kaj Kaji kaj J E-Literatura Societo korektas la frazojn verkitajn de siaj membroj. En diversaj gazetoj, (LRO, E-Lernanto) oni trovas kolonon, kie la redaktisto korektas la frazojn de siaj abonantoj. Oni povas diri, ke japanaj E-gazetoj mem estas bona kores-

ponda kurso kun detalaj komentari-
oj. — (Kuw.)

Ekzameno neniam okazis, kvan-
kam en 1922 JEI projektis. — (Kaw.)

Argenta kunsido. Organo
por krei kaj ĝui E-an atmosferon,
en Tōkyō. Fondintoj: Kaijiro Ooha-
ŝi, Keuji, Niŝino, Kijohiko Cujuki,
sidejo: Meiji-Seika-Teejo, ĉe Ginza
Ni-ĉome, Kjobaŝi-ku. Funkcias de
1928. Celo: konversacio nur en E.
Jam ekaperis kelkaj idoj, ekz. la No-
va Kunsido, la Kanda Kunsido, la
Ikebukuro Kunsido, ktp. Tiel la ĉef-
urbaj E-istoj povas trovi E-an paro-
lejon ĉiuvespere.

Gazetaro. Centra, ortodoksa ga-
zeto: de 1906 Japana Esperantisto
(JEA), de 1920 La Revuo Orienta
(JEI). Privataj entreprenoj eldonis si-
ajn organojn (ekz. La Esperantisto
de JEA de Kaji, E en Nipponlando
de Ishiguro). Fierindaj revuoj de pri-
vataj individuoj: Orienta Azio de
Harada, Verda Utopio de Fukuta.
Unua estis tre bele kolorigita propa-
ramane, la dua prezentis japanajn li-
teraturon, moron, socialan vivon ktp.
al eksterjapanoj. — Lau Jarlibro de
JEI, 1934, 61 el la lokaj grupoj havas
proprajn organojn hektografitajn
krom kelkaj esceptoj. Preskau ĉiuj
celas tre detale konigi lokan agadon
kaj samtempe krei oportunan okazon
aperigi literaturajn verkojn de la mem-
broj ĉe junaj. Nova Sento (de Kiuŝiu
E-ista Ligo) estis tre bone aranĝita.
La plej fama studenta gazeto estas
»Liberio.« Ekzistas gazetoj entenant-
aj nur verkojn de individuo, kiu el-
donas. Proleta movado havis bonan
»Kamaradon«. — Grupo de spe-
ciala ideo: dum la gazeto de Kiboŝa
kaj la societo mem neniiĝis, Oomoto
ankoraŭ sane daŭrigas eldoni la gaz-
eton Oomoto Internacia. Per »E-lo-
gio« Kawasaki kaj Okamoto publiki-
gis siajn studojn E-logiajn. — Nunaj
fakaj gazetoj estas Studo pri la Lin-
gvo Internacia, Esperanta Literaturo,
La Lumo Orienta, La Fervojisto. —
Du gazetoj por instrui lingvon al
unua-kaj mezgradaj E-istoj: E-Ler-
nanto (JEI) kaj Verda Mondo (EPA.)
— (Kaw.)

Biblioteko. En 1919 Tokia Fi-

lio de JEA aĉetis multajn librojn de
Chif kaj fondis Tokian Bibliotekon
E-an. JEA, fondita en 1906, konservis
neniujn siajn librojn. Osaka kaj Asai
donacis siajn librojn. En sama jaro
JEI fondiĝis kaj ĝi transiris al la ofi-
cejo de JEI. En 1921 en J Kongreso
Chif konsentis, ke ĝi fariĝu proprajo
de JEI. Ĝi estas la plej granda bib-
lioteko en J-ujo, sed al ĝi mankas
multaj malnovaj dokumentoj eŭropaj.
Speciala sistemo de libro-klasado de
Ossaka. Ekz. Grosjean-Maupin, Dict.
Complet Français-E: A-III-C-33. —
(Kaw.)

Bibliografio. En Stojan, BIL
mankas multaj gravaj verkoj el J-ujo.
Ne ekzistas plena bibliografio de la
libroj eldonitaj en J-ujo. Oni devas
legi la recenzojn en »Japana E-isto«,
LRO, k. a., aŭ rigardi bibliotekon de
JEI. — (Kaw.)

Entreprenoj kaj Librejoj.
1) E-Propaganda Asocio, Kameoka.
Por propagando de E organizata ĉefe
de Oomotoanaj E-istoj. Fondita en
1923. Organo: Verda Mondo (unue
Verda Gloro). — 2) Japana E-a Aso-
cio (J-e: Nippon E-Sya), Tōkyō. Pri-
vata entrepreno de Tokuo, Osida, kiu
komencis eldoni kaj importi E-ajn
librojn en 1920, kiam neniu kuragi-
tis tion fari. Eldonis multajn utilajn
lernolibrojn; ekz. Plena kurso de E de
Chif. Tiam multe bonvenata, sed nun
ne laboras aktive. — 3) Japana E-
Asocio (J-e: Nippon E-Kai), Tōkyō.
Privata entrepreno de Hirokazu Kaji,
fondita en 1927. Eldonas E-ajn lib-
rojn kaj gazetojn: La E-isto (dumo-
nata). Alia nomo de eldona fakoj: E-
Kenkyu-sya. — 4) Es-Nippon-ŝa, Tō-
kyō. Post likvidiĝo de la kultura so-
cieto »Kiboŝa«, fondiĝis en aŭg. 1933
sub zorgo de Kōzi Tasiro. Gazeto:
E en Japanujo. Dissolviĝis 1934. —
5) Kanija Librejo, Kyōto. Privata lib-
rejo de Nakahara-Syūzi, kiu eldonis
kaj importis E-ajn librojn de 1920.
Eldono de unua J-E vortaro. — 6)
Fronto-ŝa, Tōkyō. Privata entrepreno
de Ooŝima-Joŝio. Eldonas de 1933 ga-
zetojn »Studo pri la lingvo int.« (du-
monata) kaj »E-a Literaturo« (dumo-
nata). Abonantoj: SLI 100, EI 150. —
7) E-Fako de Tokio-do, Tōkyō. To-
kio-do, unu el la plej grandaj libro-

vendejoj en Tôkyô, fondis E-takon en 1930 kaj vendas E-librojn en-kaj ekster-landajn. 8) Maruzen. La plej granda librovendejo de eŭropaj kaj usonaj libroj, filioj diversloke. De antaŭ komenco de organizita movado importis E-librojn, kvankam ne konstante. Tio faris kontribuon al JE-movado, ĉar ĉiuj kuras al Maruzen, kiam ili serĉas ion novan. Krom la nun funkciantaj ekzistis diversaj entreprenoj, kiuj dissolviĝis. 9) Ekzistas multaj aliaj librejoj, kiuj eldonas plurajn E-ajn verkojn. Ekz. Sôbunkaku, Tettô Syoin, Hakubunkan, Daigaku Syoin, Talyôdô, Sôbundo, Okazaki Syoten, Nippon Syoten, Kokubunsya, Naigaisya, Miraisya, ktp. — La plej granda librovendejo kaj importisto de eŭropaj E-libroj estas kompreneble JEI. — (Kuw.)

Jarlibro de JEI. 1922, 1923, 1926 (detala historio de E-movado en J-ujo), 1929 (nur adresaro), 1932 (adresaro de lokaj grupoj, instrukcioj al grupoj), 1934 (kritiko pri organaj gazetoj de lokaj grupoj). — (Kuw.)

Statistiko de libroj eldonitaj en J-ujo. Kvankam ne kompleta por la jaroj 1906—1920, la sekvanta statistiko donus supervidon pri J E-movado: tre multe da libroj pri E kaj kompare malmulte da libroj en E, el kiuj lastaj sciencaj verkoj okupas konsiderindan procenton. Ĉirkaŭ 1906 eldoniĝis 3 vortarej kaj 8 lernolibroj, dum 1907—1919 eldonaj estus terure malmultaj:

	1921	1922	1923	1924	1925	1926
Vortaro	1	3	—	2	—	2
Lernolibro	2	12	15	9	15	7
Literaturo	2	2	3	5	1	3
Socio	—	—	—	—	—	1
E-movado	1	2	3	3	2	1
Scienco	—	—	4	2	5	3
Sumo	6	19	25	21	23	17

Lernolibroj kaj vortaroj. Unuaj pioniroj legis anglajn verkojn de O'Connor, eĉ nun lernolibroj en angla lingvo estas multe utiligataj de japanoj, ĉar preskaŭ ĉiuj inteligentuloj komprenas angle. Unua lernolibro en J-ujo de Hasegawa estis kompil-traduko el rusa. Poste Chif verkis faman »Plenan Kurson«. Nun plej ŝatataj lernolibroj estas tiuj de

Ossaka pro korekteco, detaleco kaj facileco. Diversaj verkoj de Ishiguro troviĝas sur la bretoj de ĉiuj librovendejoj. Unua sistema E-J vortaro de Kroita estis traduko el Motteau, E-A, poste kelkaj kompilis Plenan E-J Vortaron sur bazo de Boirac. Nun plej uzataj estas tiuj de Okamoto kaj Ishiguro. — English-E-E-Eng. Dictionary. Presita de Muramoto. Unua E-libro en Japanujo. 1906. — Sekaigo. Verkis F. Haŝegawa. Unua lernolibro por japanoj. 1906. — Plena kurso de la lingvo E (E Zentei). Verkis T. Chif. Edukis multajn japanojn E-istojn. Unua eld. 1914. — E Kompleta kurso por japanoj. (Syôkei), Verkis Ossaka. Nun plej populara lernolibro. Unua eld. 1927. — Memlernanto de E (Mohan E-Dokusyu). Verkis Ossaka kaj Aki-ta. Plej detala lernolibro por japanoj. 1923. — Fundamenta legolibro. Verkis T. Sasaki. Propra metodo por komencantoj, komentario en E. Unua eld. 1927. kvara 1933. 60 p. — Proleta kurso de E. Kompilis Studgrupo de E en Instituto por Scienco Proleta, Tôkyô. Ĝis nun plej bonkvalita koresponda kurso por japanoj. 6. vol. 1930. — Plena E-J Vortaro. Verkis K. Nakamura, K. Kroita, T. Chif, per kunhelpo de K. Ossaka kaj R. Sugiyama. Bazita sur Vortaro de Boirac. Antaŭ ĝi kelkaj malgrandaj (inkluzive tiun de Kroita). Tre vaste uzata antaŭ apero de Vortaro de Okamoto. 1914, 423 p. — Plena J-E Vortaro. De Chif. Verko de vetera-

	1927	1928	1929	1930	1931	1932	1933	Sumo
Vortaro	—	2	3	1	—	1	2	17
Lernolibro	7	9	7	6	10	8	1	108
Literaturo	4	3	—	3	5	6	7	44
Socio	1	2	—	2	—	5	5	16
E-movado	4	1	1	3	2	4	2	29
Scienco	1	8	1	1	2	2	8	37
Sumo	17	25	12	16	19	26	25	251

KUWAHARA-Th. kaj H. NISIDA.

no. 1717 p. — Moderna Vortaro E-J. De Ishiguro. Intencis kolekti kiel eble plej multe da novaj vortoj. 1933, 509 p. — J-E Vortareto. Kompilis Sanko E-a Grupo, Kyôto. Malgranda, sed tre praktika. 1922, 253 p. — Nova Vortaro E-J. De J. Okamoto. Praktika, nun plej multe uzata. Unua eld. 1926, 16-a eld. 1933, 301 p. — Nova

Vortaro J-E. Tre zorge kaj konscience kompilita de J. Okamoto. Plej granda nacia E-Vortaro, la literoj de paĝoj estas miniaturigitaj per tozinkotipografio, tre fiera presarto japana. Aperos en 1934, 677 kaj 100 (?) p. — Seslingva Vortareto de Medikamentoj laŭ J. Farmakopeo. E-Latina-Japana-Germana-Angla-Franca. Kompilita de Hermesa Rondeto. Sen kono de E neniel utiligebla, kio faras studon de E necesa por uzantoj ne-E-istaj. Pri metodo de terminaro iom modifis tiun de Nomenklatureo de Kemio de ISAE de ilia propra vidpunkto. 1930, 208 p. — Granda Gramatiko de E. De Chif. Vol. 1 Prepozicio, Vol. 2 Adverbo. 94 p. 75 p. 1922. Nur du volumoj aperis. Unu el la tre ampleksaj, metodaj en la mondo. — Fonetika Studo de E. De Okamoto, en japana lingvo. 61 p. 1925. Post kompara studo de la opinioj de antaŭuloj montris sian propran opinion. Detala. — Altgradaj lingvaj studoj: Granda Gramatiko de Chif. Komentario kaj analizo de Ossaka, Fonetika kaj leksikologia studo de Okamoto, Komentario kaj bibliografio de Kawasaki, Sociologia lingvoanalizo de S. Ito, ĉiuj en japana lingvo; statistika enketo de Z-a lingvo-uzo de T. Sasaki kaj J. Iuŝita, k. a. — (Kaw.)

Kie estas Amo, tie estas Dio. Detala prilingva komentario al la teksto de Tolstoj-Sidlovskaja. Unika bibliografio de la libroj, kiuj utilas por praktike studi E-n. Verkis Kawasaki, en japana lingvo, 1930. Dua pligrandigita eldono en 1934, 382 p. — (Kuw.)

Literaturo. Ankaŭ por japanoj estas multe pli facile konkeri E-n ol iun alian lingvon. Pro tio, malgraŭ mallonga vivo de la lingvo en Japanujo kaj malgranda nombro de ĝiaj adeptoj, sufiĉe multaj emas traduki literaturajojn. Unuj tradukas vulgarajn krimanalogiajn rakontojn. Ekz. R. Edogaŭa: »Unu Biletu« (J. Simomura); R. Edogaŭa: »Ora Masko« (J. Simomura); S. Kooga: »Dezerto« (S. Minami). Aliaj elektas pro speciala motivo verkojn ne tre valorajn je la literatura vidpunkto. Ekz. E. Iŝihara: »Verda Karto« (H. Jamanaka) premiita romano ĉe konkuro, temanta socion post 50 jaroj. Ankaŭ en la

tradukoj el la pura beletristiko superregas populareco. Ekz. el T. Ariŝima estas tradukitaj du sufiĉe grandaj verkoj, nome »Deklaracio« (T. Tooguu), »Senbendaŭre amo rabas« (T. Tooguu), dum traduko el N. Siga estas metata en malgranda broŝureto. »Krimo de Fan« (M. Kaji). El alia generacio, oni eldonis tradukon de kelkaj verkoj de K. Kikuĉi, »Patro Revenas« (H. Kaji), »Amo de Tojuuroo kaj aliaj teatraĵoj« (J. Simomura), sed neniam el R. Akutagaŭa, kiu staras sur multe pli alta pozicio kiel artisto. Krom la jam menciitaj aperis en libra formo: M. Huĝii: »Nova Satano«, novelo (I. Sakrada). — N. Nakata: »Inkubo«, dramo (J. Jasuda). — U. Akita: »Danco de Skeletoj«, teatraĵoj (H. Ŝuzui, K. Susuki). — S. Nacume: »Turo de Londono«, novelo (S. Nishi). — J. Kaneko: »Lavisto kaj Poeto«, teatraĵo (T. Tooguu). — J. Jamamoto: »Infanmurdo«, teatraĵo (J. Simomura), »En la Nebulo«, radiodramo (K. Cujuki). — K. Okamoto: »Epizodo en Ŝuzenji«, teatraĵo (Mijake-Ŝ.). — K. Fujisaŭa: »Gracia«, teatraĵo (M. Hata, T. Murakami). — N. Hajaŝi: »Bildlibro sen bildoj« (H. Kaji, H. Ŝutoo). — S. Tokunaga: »Malsato en Riĉa Rikolto« (K. Nakagaki). — Ĉan-Hjokĉu: »Forpelataj Homoj« (Takagi H.). — Ankoraŭ eĉ doniĝis neniu klasikaĵo en la formo de libro. Nur fragmentoj aperas en gazetoj. En 1932 fondiĝis Japana E-literatura Societo sub la iniciato de Mijake-Ŝ. kaj Takagi-H. En tiun socion kunfandiĝis literaturamantoj el la ambaŭ tendaroj de la neŭtralaj kaj tendencaj E-istoj kun la komuna celo de plialtigo de lingva tekniko kaj prezento de la japana literaturo en ĝusta maniero. Laŭ MIJAKE-ŜIHEJ.

Notoj al la »Literaturo«. Tradukaĵo de japano eldonita unuafoje en Eŭropo estas »Japanaj Rakontoj« (E-a Biblioteko Int.) kompilita de Chif, 1910. »Deklaracio« (Int. Mondliteraturo) trad. de Tooguu, 1924. Poste tradukaĵoj de Simomura aperis en Budapeŝto. »Perloj el la Oriento« de Ossaka kaj »Verda Parnaso« de I. U. estas du kolektoj de tre bonkvalitaj tradukaĵoj el japanaj,

ĉinaj klasikaj kaj modernaj. En kvanto Tooguu (†) kaj Ŝimomura superas ĉiujn aliajn. Mirinda estas energio de Nohara, kiu tradukadas de la komenco de J E-movado malfacilajn altvalorajn japanajn, ĉinajn, hindajn klasikojn. Lastatempe Nakagaki daŭrigas sinceran studon kaj praktikon pri tradukarto. J. poemoj tradukitaj de Grabowski, Kalocsay, k. a. lertaj sed ne el la originaloj. Hohlov komprenas J. lingvon kaj kritikis tradukaĵojn de J. poemoj. N. KAWASAKI.

E-istoj, kies biografio estis sendita post la presigo de la unua volumo:

A b i k o Teizirō, aferisto. Fondis 1906 en Tōkyō la duan societon en la lando »Nippon E-Kyōkai«, kiu li poste likvidis kaj kunfondis JEA. E-konsulo en Tōkyō, 1907. Kunkompiis J-E Vortaron, 1906.

A i z a ŭ a Heikiĉi, licea instr. Nask. majo 1898. Sindona laboranto en Yokosuka post foriro de Ossaka, 1915—18. Eldonis gazeton »Diino de Stelo.«

A k a g i Kyutarō (k'ūtaroo), estro de poŝtoficejo. Mortis. Fondis en 1909 filion de JEA en Minagi, Okayama-ken. Monhelpis al JEA por J-E-isto. Dua provo de J-E Vortaro, ne eldonita.

A l e x a n d e r Agnes, usona propiŝtino de Bahajismo el Hawaii. Loĝas en Japanujo de 1915.

A s a d a Eiji, prof. de fremdlingva kolegio de Tōkyō. Nask. 22 majo 1865, mortis 11 nov. 1914. Noblkaraktera. Lingvisto, specialisto de semidaj lingvoj. Estis LK.

A s a d a Hazime, d-ro med., prof. de jurmedicino antaŭe en med. fakultato de Nagasaki, nun en virina med. kolegio en Tōkyō. Nask. marto 1887 en Miyagi-ken. Prelegis pri sia fako en SU de 19-a UK en Danzig.

B a b a Kijohiko, bankoficisto. Nask. 24 dec. 1903 en Yamaguti-ken. Antaŭa familia nomo: Macumoto. E-isto de 1920. Studento de Z-a vortuzo de E, artikoloj en LRO, 1927—28. Trad. en J. »Fumejo de l' opio« de Reymont, 1930, trad. en E »Verdstela Vojaĝo« de Toki-Zenmaro, 1929.

C h i f Toshio, (Ĉihu, toŝio). Nask. 22 jan. 1881 en Saga-ken. Lernis E-n en la E-Lernejo de Osugi en 1907

(?). Efektiva red. de Japana E-isto (1906—11). Kun Ossaka du kolonoj en J. E-movado. Komprenas E-ismon fidele laŭ la Bulonja Deklaracio kaj multe diskutis kontraŭ Ossaka pri organizaj problemoj. Verkis: multajn utilajn gramatikajn librojn kaj vortarojn. Kompilis: »Japanaj Rakontoj« (unua verko de J E-isto eldonita en Eŭropo), 1910; »E-a Legolibro kaj Krestomatio«, 1922. Verkis: »Plena E-J Vortaro« (kun aliaj), 1914; »Plena kurso de la lingvo E« (sistema lernolibro edukinta multajn kapablajn posteulojn), 1914 (en 1921 renovigita eldono); »Granda Gramatiko de Chif« (tre detala priskribo; 1-a volumo Prepozicio, 1922; 2-a vol. Adverbo, 1923.); »Plena J-E Vortaro« (multpaĝa), 1927. (Kuw.)

C u j u k i Kijo. Nask. 19 marto 1907 en Kanagawa-ken. E-isto de 1926. Helpred. La Revuo Orienta. Trad. »En la nebulo« (radiodramo de Yamamoto), 1930. Verkis: »Stala Biblio de Samurajismo«, 1931.

D i c k (dik) R. Hugo, sviso, firmano. Loĝas en la lando de 1917. Lernis E-n en Rusujo. Multe kontribuis al revigligo de J. E-movado, loĝante en Yokosuka. Instigis la tondon de J. Komitato por komuna komerca lingvo, 1919.

E g u ĉ i Ren, oficisto. Nask. 1898 en Hukuoka. Metoda sekr. de E-Ligo de Kyusyu, la plej bone organizita regiona liĝo kun propra organo kaj propra jarkongreso.

F u k u t a Kunitaro (-roo), oficisto de asekura kompanio. Nask. 6 sep. 1886 en Tottori-ken. E-isto de 1906. Kunfondis 1920 en Osaka nur E-an gazeton »Verda Utopio«, kaj per tio multe disvastigis la sciojn pri Japanujo al tuta mondo. Iam komitatano de SAT. Posedas multajn malnovajn E librojn, gazetojn, dokumentojn.

G a Morizo. Nask. 1885 (?). Iama ĉefdel. de UEA. Fondinte 1920 Orientan Librejon E-an, importis E-librojn multege el Eŭropo, kiam preskaŭ neniu kuragiis tion. (En 1922 la laboron heredis Librejo Sihōdō). Ofte interpretis E-ajn paroladojn de d-ro Ramstedt, finna vicambasadoro en Tokyo.

G a u n t l e t t George Edward Luc-

kman anglo, instr. de angla lingvo. Nask. 1868 en Swansea, Suda Kimrujo. De 1890 ĝis nun loĝas en Japanujo. En 1905 eldonis korespondan kurson de E. Tio estis la unua publika instruo de E en Japanujo.

Gotoo Seikoo, ĉefo de multamembra morala societo Kiboŝa (v.) nun disfalinta, estis antaŭe instruisto de knabina liceo. Nask. 19 aŭg. 1884 en Ooita-ken. 1930 fondis E-takon en K. («E-Kiboŝa», marto 1930 — jul. 1933) kaj rekomendis lernadon de E al siaj grandnombraj adorantoj. Enkondukis E-n kiel devigan lecionon en Kinrō Knabina Liceo kaj Nippon Presarta Lernejo, ambaŭ administritaj de K. Ĉeestis la UK en Oxford, 1930.

Hajaŝi Joŝimi, apotekestro. Nask. 15 jun. 1909 en Mie-ken. E-isto de 1924. Fidante nur al E-istoj li travojaĝis Europon 1928 dum kvar monatoj kaj lia vojaĝlibro vekis grandan sensacion en la J-E-istaro.

Hayasi (hajaŝi) Tadasu, grafo, ministro de eksteraj aferoj. Nask. 1850, mortis 10 jul. 1913 en Tōkyō. Prez. de JEA ĝis la morto.

Harada Yubi (ps. Soken). Nask. 1850 (?), mortis 6 okt. 1916. Kiam li perdis sian solan amatan filon, li decidis daŭrigi lian vivlaboron, t. e. E-n, kaj ekstudis la lingvon, estante pli ol 60-jaraĝa. Lia fervoro kondukis ĝis tio, ke li povis mem redakti hektografitan, belkolore lustritan gazeton «Orienta Azio».

Hasegawa Tacunosuke (ps. Futabatei), verkisto. Nask. 1864, mortis 10 majo 1909 sur ŝipo hejmen de Rusujo. E-isto fariĝis en Rusujo. Japanaj verkistoj eksciis ekziston de E pere de li. Verkis lernolibron kaj komenton al la Ekzercaro, 1906.

Hikosaka Motusuke. De jun. 1909 ĝis 1910 eldonis en Tōkyō gazeton por eksterlandaj E-istoj «Samideano Ĉumonata», kvazaŭ konkure al «J. E-isto».

Hirano Nagakacu, (ps. Hirano Jugao), vicgrafo, oficisto ĉe Centra Radio-Stacio de Tōkyō. Nask. 1895 en T. Kunlab. al «Verda Utopio». E-poeto.

Inoue ŝoogecu Tadaŝi, stenografiisto de Oomoto. Nask. 22 aug.

1909 en Simane-ken. E-isto de 1926. Red. de «Verda Mondo» 1927—34. Kursgvidoj diversloke tra tuta Japanujo. Rapida parolanto en E. Verkis «Praktika Konversacio E-a», 1933.

Iwahashi Takeo (iūahaŝi), blindulo, kristano, prof. de Kansei Gakuin Univ., instr. de urba blindula lernejo de Osaka, en kiu li, S. Ito k. a. gvidis oficialan kurson de E (1922—31). Nask. 16 marto 1898. E-isto de 1918. Ĉeestis 13-an UK. Prez. de J. Asocio de Biinduloj E-istoj Verkoj en Brajla alfabeto: J-E Vortaro, Lernolibro.

Izumi Ŝigeo (plumnomo), socialisto. Nask. 31. okt. 1902 en Saga-ken. E-isto de 1921. Kunfondinto de J. Prolet-E-Unuiĝo, 1931.

Jamaga Taiji, presisto, anarkisto. Nask. 25 jun. 1892 en Kyōto-si. Lernis E-n de Kroita kaj Ĉif en 1908. Jam sekr. de Kroita. Korespondis kun diverslandaj laboristoj.

Jamanaka Hideo, estro de eksterlanda fako de Centra Telegrafeco, Harbin. Nask. 9 febr. 1905 en Kyōto-hu. Trad. en E «Verda Karto» (filmo novelo), 1931.

Juĉi Ĉomoŝin, elektra ing. de radio-stacio, Kanazawa. Nask. 11 okt. 1894 en Hukuoka-ken. Kunfond. de Nagoya ES, 1932. Del. (por radio) de UEA en K., 1934.

Lokamoto. Komprenoble ĉefurbo Tōkyō (Tokio) kun la oficejo de JEI estas la centro de movado. En Yokosuka fondiĝis unua grupo E-a en J-ujo, kaj multe laboris Osaka tiam juna. En la mezo de la lando estas Nagoya, kie laboris Ishiguro kaj nun estas Osaka, Inouye. En Sizuoka nia maljuna K. Takahaŝi. La distrikto Kinki, havanta antikvan historion kaj kulturon, havas multajn grandajn urbegojn: Kyōto, Osaka, Kōbe, kie de tre frua tempo nia movado ekzistis. Osaka E-Societo estas plej bone administrata kaj aktive laboranta loka grupo kun Ŝindo, Kuwahara, Niŝida. Pli okcidente de Kobe estas Okayama, fama pro unua sistemo movaŭo t. e. eldono de koresponda kurso de Gauntlett. En la insulo Kyusyu estas bone organizita ligo Kyusyu E-Ligo, kolektanta al si diversajn lokajn grupojn de K. En

Kameoka apud Kyôto sidas Oomoto. En la distrikto Hokuriku estas Kanazawa, kie agadis Asai. En nordorienta distrikto estas Sendai, kie agis Kuwahara. En Hokkaido estas ankaŭ E-Ligo. Detalon donas Jarlibro de JEL. — (Kaw.)

Fervoraj propagandistoj en diversaj lokoj. En Tôkyô estas multaj eminentuloj, kiujn ni ne citas ĉi tie. Satojoŝi, Manzaŭa (f-ino) Tarao zorgas Tokian E-Klubon (loka amika grupo). En jenaj lokoj aktive propagandas fervoraj E-istoj (en parentezo) Nur kelkaj reprezentaj estas menciataj. Akita (s-ro Nakada), Amagasaki (Ozima), Arita (Hisazumi), Beppu (Asô, Simokawara), Dairen (Nakamizo, Kitao), Gogyogawara (Mita), Hakodate (Odazima, Yosida), Harbin (Pavlov, Yamanaka, Ga), Heitô (Ooisi), Hiratuka (Ŝimizu), Hiroshima (Nomura, Okumura), Hisai (Kudô), Hôten (Obana), Hukuoka (Eguci, Horiuĉi, Nagamatu, Ito, Oshima, Yosimati), Hukusima (Simazaki), Hukutiyama (Ootani), Huzan (Araki), Iizuka (Nomiya), Issi (Hajaŝi), Kagosima (Sigemacu), Kaizyô (Seki), Kameoka (Niŝimura K., Itô E., Otaka, Nakamura T., Inoue S., Hirose, Hiraki), Kanazawa (Segaŭa, Masuno, Jui, Cukamoto), Karahuto (Matuda), Keizyô (Oojama, Hasegaŭa, Kim, Sirouĉi), Kisiwada (Nakanisi, Nisida), Kitazima (Tatibana), Kokura (Tanaka), Kôbe (Tukimoto, Maeda), Kumamoto (Kamio, Jamto, en Kuma-gun Dohi), Kurume (Isobe), Kuwana (Itui), Kyôto (Ŝibajama, Sisido, Kondô, Nakahara, Yamada, Oohasi), Matusaka (Maruyama), Matuyama (Murakami, Matuki), Miyazaki (Sugita, Watanabe), Morio-ka (Ikawa), Muro (Kobajaŝi), Muro-ŝi (Sato), Nagano (Kajima), Naga-Nagoya (Yamada, Siraki, Takenaka, saki (Ueda, Tomimatu, Takahara), Kaŭai, Kaneko, Yazaki, Narita, Miwa; en Umibe-gun Kuromiya, en Simoina-gun Komatu), Nara (Mijatake), Niigata (Kubo), Nisinomiya (Tanamura), Obihiro (Harada), Okayama (Nanba, Sibata, Yagi, Sasaki), Ooita (Takahasi), Oomiya (Kamijama), Oomuta (Ueda H., Araki, Ueno), Oosaka (Sindo, Kuwahara, Niŝida,

Kurosaki, Kojima), Ootu (Nakaoji), Otaru (Fukuda G.), Saga (Kikuti), Saitama, Sapporo (Fukuhara M., Aizawa H., Atumi), Sendai (Sugawara, Nakamura, Kikuzawa, Yosida, Simanuki), Sinkyô (Hutida), Sirakawa (Siota), Sizuoka (Takahasi K., Kaŭai H.), Suita (Terada, Kuroda), Tagawa (Ooba I.), Taihoku (Yasuda, Kai, Eriguti, Takegami), Tainan (Oo), Takaoka (Odera, Siho), Takasaki (Yamaguti), Tateno (Oishi), Tiba (Suzuki M., Mizuguti), Tikuzyô (Ueda Z.), Tobata (Hayasi M.), Tomakomai (Uatanabe), Toyama (Yokawa, eksterurbe Hukai), Toyohasi (Takahasi T.), Turuga (Ooba A.), Tyôhu (Nohara), Utunomiya (Ŝibaŝi, Tominaga), Wakayama (Ogasawara), Yamabe (Nakamura H.), Yama-iro (Takeuĉi), Yawata (Siroisi), Yokkai (Hirano R.), Yokohama (Hosaka, Iida, Yosida, T., Tomimori, Tameie, Arakawa, Murakami, Haji), Yoku-suka (Matuba), Yokote (Hirahuku), Yukuhasi (Ayukawa). (Kawasaki, Kuwahara, Cujuki kaj Kidosaki.)

L. K. Sur provizora listo montrita en 1-a UK estis Gauntlett, Mackenzie, ne-japanoj, sed loĝintaj en J-ujo. En 1907 E. Asada elektigis. Post lia morto longa interrompo. Post la milito ĉ. Fujisawa, K. Niŝimura farigis L. K. dum restado en Eŭropo. En 1933 du junuloj N. Kawasaki, J. Okamoto. Memoru, ke kvankam Cart proponis en 4-a UK, ke japano devas havi unu seĝon en Akademio, ĝis nun veteranoj T. Chif, K. Ossaka ne eniris en LK. — (Kaw.)

Lingvaj opinioj.

A. J-a E-logoj pri evoluo de E. Artefarita int. lingvo neutrala kiel E devas esti la plej logika lingvo, ĉar nur la logiko estas vere komprenebla kaj neutrala por ĉiuj homoj de diversaj gentoj. Japano preferas facilan elierneblecon de E pro kunmetado de radikoj al unuavida divenebleco pro pseudointernaciaj radikoj de Occidental k. a. kiujn ofte ŝatas eŭropanoj. Ne blinde respektu la malbonajn kutimojn de eŭropaj lingvoj, sed plilogikigu nunan E-n.

I. Forigu pseudointernaciajn radikojn. Enkonduku imperiismo, imperiisto, materiismo, materiisto, naci-

ismo, naciisto anstataŭ imperialismo, imperialisto, (kiuj ne estas derivitaj de imperia'o), materialismo, materialisto (kiuj ne estas derivitaj de materialo), nacionalismo, nacionalisto.

2. Enkonduko de novaj afiksoj pli oportuna ol tiu de multaj pseŭdo-internaciaj radikoj. Ren'ito, pulm'ito, orel'ito, ktp. anstataŭ nefrito, pneŭmonio, otito ktp. Orel'algio, nerv'algio ktp. anstataŭ otalgio, neŭralgio ktp. Bird'ologio, fiŝ'ologio, dent'ologio, orel'ologio ktp. anstataŭ ornitologio, ihtiologio, odontologio, otologio ktp.

3. Pri la uzo de la difina artikolo. Estu ĉiam logika. Antaŭ propraj nomoj neniam uzu. Ne uzu antaŭ la nomoj de monatoj, sezonoj, semajntagoj, kiam ili ne estas difinitaj.

4. Ne uzu pluralan formon por nomi unu kompletan tuton ne facile disigeblan. Pantalono, Ateno, Ando anstataŭ pantalonoj, Atenoj, Audoj.

5. Unu signifo por unu radikoj. Plumo havas du signifojn: birda plumo kaj skribilo. Por la lasta enkonduku neologismon.

6. Ne insistu unu formon internacian uzatan por eviti homonimon, forigu formon kun duobla konsonanto: Finno, ĉino. Por la antaŭa enkonduku »suomœ«.

7. Nur E ortografio sola regu en E-frazoj laŭ la konsilo de Z (Orig. Verk. p. 91).

B. J-aj radikoj ĝis nun uzataj en E.

1. nomoj de altranguloj: mikado, ŝoguno, daimio.

2. nomoj de profesiuloj: samurajo, geiŝo, bonzo.

3. nomoj de J-aj elpensitaj aŭ faritaj de J-oj: kimono, sojo, jirikŝo, rikiŝo, sakeo, getao.

4. nomo de religio: ŝinto.

5. nomoj de plantoj: ginkgo, mokso.

6. ago laŭ J-aj kutimoj kaj moroj: harakiri.

C. Neologismoj troveblaj en »Nova Vortaro J-E«, 1934.

1. J-devenaj radikoj.

(a) Radikoj kun pure J-a deveno. (Radikoj, kiuj de malnova tempo ĝis nun estas uzataj en J lingvo.) K. e.: anzuo (speco de planto), basoo (speco de planto), bivo (speco de muzik-

instrumento), ĉirimeno (sp. de ŝtofo), habutajo (sp. de ŝtofo), hakamo (sp. de vesto), hajko (sp. de poemo), tohuo (sp. de mangajo), miogo (sp. de planto), haoro (sp. de vesto), sukijako (sp. de mangajo).

(b) Radikoj kun alilingva deveno. (Radikoj, kiuj en malnova tempo estis enkondukitaj en J lingvon el aliaj lingvoj kaj ĝis nun estas uzataj de J popolo.) 1. Radikoj kun ĉina deveno. K. e.: fuco (futzŭ; ilo uzata de bonzo), Ĉingo (ch'ing; nomo de ĉina dinastio) ktp. 2. Radikoj kun sanskrita deveno. K. e.: ulambano (ullambana; budaisma meso por mortintoj), aviĉo (avici; unu parto de infero budaisma), homao (homa; speco de budaisma meso), upasako (upasaka; budano) ktp. 3. Radikoj kun alia deveno. komfeto (Portugala comfeitos; sp. de sukeraĵo) ktp.

2. Internaciaj radikoj (enkondukeblaj laŭ la 15-a regulo de nia Gramatiko).

(a) Internacie vaste konataj radikoj. Ekz.: aerobuso, andezito, anti-monito, bronzito, cefalotorako, dum-duma kuglo, eledro, ektoblasto, fizikratio, fiziografio, fuzelo, hematogeno, involuto, kromosomo, kromatino, melanodermio, periaŝtro, statomografio, spirometro, sismogramo, sintaksiso, termometro, tromometro, urinometro, ktp.

(b) Ne tiel vaste konataj radikoj (plejparto el kiuj estas nomoj de plantoj aŭ animaloj, kaj kies elementoj estas latin- aŭ grekdevenaj). Ekz.: ankistrodono, brasenio, cistofilo, dioktofimo, dendrobio, digeneo, entormorfo, ekinoklo, eupaguro, fortunelo, farbato, fatsio, fiostakiso, gelidio, limnorio, koikso, kriptomerio, luciolo, petaŭristo, plekogloso, traki-karpo, trakuruso, vigno, ktp.

Kiamaniere JE-istoj studadis E-n? En 1-a periodo (1906—1930) JE-istoj havis ĉelon kiel eble plej perfekte ellerni E-n kaj penadis fidele imiti la bonajn stilojn de eminentaj E-istoj en Eŭropo. Kaj ili atingis la ĉelon. La dua periodo komenciĝis en 1930, kiam N. Kawasaki kaj J. Okamoto eldonis la 1-an kajeron de »Esperantologio«. La gazeto havis

nur efemeran vivon, sed grandajn efikojn. Ekz. en 1933 Ooŝima J. komencis eldoni la gazeton »Studo pri la Lingvo Internacia«. Jam progresemaj japanoj ne blinde imitas eŭropanojn, sed komencis kritiki ilin kaj publikigis originalajn, profundajn studojn de la lingvo. J. OKAMOTO.

Fremdaj E-istoj venintaj al Japanujo kaj helpintaj al la movado: Mistler (unuafoze skribis pri E en J-ujo), Mac Kenzie, Gauntlett Edward (donis korespondan kurson de E), Edler el Vladivostok, Borisov Arkadio el Blagoveŝensk, Vonago el Vladivostok, Kostin el Harbin, Alexander Agnes, Dick Hugo sviso, Roscoe, Vaughan, Eroŝenko Vaŝilij, Kuznecov, Serišev, Ramstedt G. J., Kolomic, Černin, Scherer, Major József. Estas atentinde, ke Postnikov, ruso, kvankam ne venis al Japanujo, estis unu el la patroj de nia movado, ĉar li instigis Hasegawa Futabatei. — (K. Ossaka kaj Kaw.)

Aliaj int. lingvoj. Eldono de dika vortaro Volapük-Japana, A. Oka, lida k. a. estis unue volapükistoj. Sistema movado de V. ne okazis. Kelkaj studis Idon, sed nek formiĝis organizo propaganda, nek aperis lernolibro, vortaro, gazeto. La principoj de Ido neniam povas plaĉi al ĝenerala publiko J. Nur iuj profesoroj de angla filologio, kvankam ne akceptante artefaritan int. lingvon, opiniis ke Ido estas plisupera ol E, dank' al influo de Jespersen, kies verkoj pri angla gramatiko kaj lingvoscienco estas tre popularaj en J-ujo. J. Ministrego por edukado venigis por plibonigo de eduko pri angla lingvo H. E. Palmer, idisto. Ossaka kaj Okamoto analizis kaj atakis strukturon de diversaj aliaj projektoj de IL en LRO, 1924, 1925 k. s. K. Kondō, Ishiguro, Ooŝima sin okupas pri sciencastudo de mondlingva historio. Unuvorte, E kaj artefarita int. lingvo estas perfekta sinonimo en J-ujo. Basic English trovis seriozan konsideron kaj laboron ĉe kelkaj univ. profesoroj de angla lingvo, kio plene pravas malbonan rezultaton de instruo de angla lingvo en mezaj lernejoj. — (Kaw.)

Nishi (niŝi) Seiho, japano, prof. de

anatomio en Imperia Univ. de Tokyo. Nask. 6 jan. 1885 en Tokyo. Dir. de JEI. Vicprez. de TEKA. Fakaj verkoj en E en »Folia Anatomica Japonica« kaj Int. Med. Revuo. Trad. 'Turo de Londono' (be.literaturo de Natume-Soseki), 1926.

Niŝida Hideo, japano, oficisto de asekura kompanio. Nask. 29 jun. 1903 en Nara. Klopodis por XVI-a JE-Kongreso en Osaka kaj Osaka ES. — (Kuw.)

Niŝimura Koogecu, japano, propagandisto de Oomoto. Nask. 23 apr. 1883 en Simane-ken. E-isto de 1923. Estis estro de Eŭropa Centro de Universala Homama Asocio, Paris. Ĉef. red. de 'Oomoto Int.' (nun en Kameoka). De 1930 L. K. Verkoj: 'Sinjoro Laŭdata' (versajoj, prozo senditaj al S-ro O. Deguĉi de diverslandaj E-istoj), 1928; 'Origino de Oomoto', 1925.

Nitobe Inazo, japano, scienculo. Nask. 1862 en Iwate-ken, mortis 15 okt. 1933 en Victoria, Kanado. Studis agronomiajn politikojn kaj ekonomion en Anglujo kaj Germanujo. Eksprof. de Imp. Universitatoj de Kyoto kaj Tokyo. 1919—26 vicĝenerala sekr. de Ligo de Nacioj; kontrolis la raporton pri E prezentitan de la sekretario al la tria ĝenerala kunsido de L. de N. kaj multe helpis por E. Estis membro de J. Imp. Akademio kaj de Supra Domo de J. parlamento. Lia verko »Bushido« (J-a kavalireco, originale en angla lingvo), 1898, estas monde konata.

Nobela peko. De M. Sadoveanu, el la rumana trad. Morariu, 1929, 60 p. »Tri rakontoj, bone tradukitaj, kiuj al ni rakontas pri la vivo kaj kutimoj de la rumanoj en la grandaj arbaroj kaj vastaj stepoj.« (La Socialisto, 1929, p:80.)

Noël Eugène, franco, militista kuracisto. Nask. 28 marto 1855 en Nancy, mortis 8 febr. 1921 en Nancy. Unue militkuracisto en Alĝerio, li parolis flue la araban lingvon, kaj verkis araban gramatikon, sed, ne sufiĉe kontenta pri sia laboro, mem detruis sian manuskripton. Tiu detalo montras, kiom severa li estis kontraŭ si mem. Longatempe sekr. de la grupo de Nancy, kies animanto li estis kun

Frecot kaj Maresquelle. Komitato de SFPE. Li skribis kaj verkis senhalte. Skribis en preskaŭ ĉiuj E-aj revuoj; kaj kiel ĉefa kunlaboranto de Cart en 'Lingvo Internacia' kaj recenzisto. Direktis la 'Lorenan-E-an gazeton' (1905—1908), kaj poste la Lorenan Stelon. Sed precipe li estis laboremata tradukisto de klasikaj; stilo rimarkinde bela, tradukoj mirinde fidelaj. Ni citu nur la gravajn: Byron: 'Ĉielo kaj Tero', 1906. 'Rolandkanto', 1906. Aristophanes: 'Plutos', 1906. Plautus: 'Rudens', kvinakta komedio, 1906. Descartes: 'Parolado pri la metodo' (kun prof. Thi-aucourt) 1906. Racine: 'Esther', tragedio, 1906. Racine: 'Athalie', tragedio, 1906. Planard: 'Procirkonstanca Edzo', vaŭdevido, 1908. Mistral: 'Mirejo' (kun Champion) 1909. Huot-Sordot: 'En la lando de la Blanka Monto', 1913. L. K. de 1909.

L. BASTIEN.

Nohara Kiiŭi, japano, instr. Nask. 10 nov. 1871 en Tyohu, Yamagutiken. E-isto de 1906. Kunlaboris de 1907 je 'Le Monde E-iste', de 1908 je 'Int. Ped. Revuo' kaj 'J. E-isto'. Tradukis el sanskrito budaismajn sutrojn: »Sukhavativjuho«, 1932; »Samantamukhaparivarto«, 1932; k. a. Trad. el ĉinaj klasikuloj de konfuciismo: »Granda Lernado«, 1932; »Doktrino de Mezeko«, 1932; »Konstantaĵo de Fila Picco«, 1933.

Nokto en Karluv Tyn. Komedio de Vrchlicky, el la ĉeĥa trad. Lukaŝ. 1921, 74 p. Teatraĵo de la 13-a UK.

Noll Margrethe Caroline, danino, estis instr., sekr., nun librotenisto. Nask. 22 majo 1874 en Kopenhago. E-isto de okt. 1907, de tiam aktive partoprenas en la propagando kaj organizado, precipe per instruado, paroladoj, skribado en gazetoj. Ĉefa gvidinto de la kontraŭ-idista movado en Danujo. Iniciatis kaj partoprenis starigon de diversaj E-societoj. Prez. de ĈDEL, 1916—19, prez. de SDE de 1922 ĝis nun. Kunlaboranto de E-gazetoj. Sekr. de Vegetara Ligo E-ista. Aŭtoro de lernolibro.

Norda Vento. Noveloj de Karinth, el la hungara trad. Bodó. 1926, 96 p. »La rakontaro estas pli ol amuzajo kaj la aŭtoro multkapabla pensvek-

anto. Bona traduko.« (G. S. 'E', 1927, p: 64.)

Nordlund Nils Alfred, svedo, gimnazia instr. Nask. 11 marto 1872 en Tvarred. E-isto de 1917 kaŭze de porpaca intereso. Estis prez. de E-unuigo de svedaj geinstruistoj kaj de E-distrikto de Skanio. Gvidis kursojn, verkis kaj mem eldonis lernolibrojn kaj vortarojn.

Norvegujo. 1. La komenca periodo. La unua norvega E-isto ŝajne estis Haldor Midthus, (v.) kiu unue ellernis Volapükon, sed poste (en 1900) li eksciis pri E, rapide ellernis ĝin kaj fervore propagandis per leteroj inter sia kolegaro. L. K.-ano de 1905. Estis tiam ankaŭ alia norvega L. K.-ano, J. Allum, sed estis neeble trovi lian nomon en norvegaj gazet- kaj libraro.

La unua gazetartikolo pri E troviĝas en monata revuo »Kingsjaa« 15/3 1904 pri »Int. komerca lingvo«, trad. el angla »Westminster Review«.

En Oslo (tiam Kristiania) ĉ. 1904 kelkaj junuloj, ĉefe studentoj, komencis propagandon por E, inter ili stud. filol. Emil Smith (nuna docento ĉe la universitato), stud. jur. Alf Johnsen, poste Hageler († 23/12 1932), kand. jur. Einar Ruud († 1908), ekslernejestro T. Davidson († 3/10 1921) kaj dana tipografisto H. Th. Thomsen, kiu lasta iniciatis kaj fondis la unuan E-klubon, 8/2 1906. Unua prez. estis Einar Ruud. Jam en 1907 la klubo povis kalkuli je 70 membroj, precipe junuloj kaj bontemplanoj. En 1906—07 vigla propagando okazis inter la bontemplano. La ĉefprezidanto de la int. IOGT, sveda parlamentano Edv. Wavrinski, skribis en la norvega »Goodtemplarbladet« serion da artikoloj pri E. Pluraj gvidantaj bontemplanoj montris intereson, kaj la supre nomita T. Davidson el-laboris korespondan kurson »20 lecionoj en E«. Fondiĝis laŭ lia alvoko koresponda klubo kun 85 membroj (1907) en 8 sekcioj de suda Halden ĝis la plej norda en la mondo urbo Hammerfest. Tiuj sekcioj tondiĝis parte dum propaganda vojaĝo de Davidson kaj parte per la bontemplana gazeto.

En Narvik tiam telegrafisto Arne

Arnessen post parolado de D. gvidis kurson kaj fondis klubon (apr. 1907).

En majo 1907 vizitis Kristianion okaze de la 50-jara jubileo de la universitato fama germana profesoro Wilhelm Ostwald. Li faris en la universitato paroladon pri E kaj la Klubo E-ista en Kristiania rikoltis multajn anojn, laŭdire la nombro de klubanoj atingis 150 aŭtune 1907.

Einar Lunde, posedanto de malgranda presejo, ellaboris komence de 1907 la unuan lernolibron: ABC en E, kiun li mem kompostis kaj eldonis. Li ankaŭ sendepende de la klubo kolektis kelkajn junulojn en kvazaŭ privata studrondo.

La ekflorado de E en 1905—08 ne daŭris. Post krizaj jaroj 1908—10 kaj post kelkajara dormado Klubo E-ista en Kristiania restariĝis 30/9 1912 kun la plej fervoraj e-istoj en nova estraro: f-ino Josefine Finholt († 3/3 1921), f-ino Rosa Bye, stud. ekon. Engesgaard Christie, ing. O. Brochmann Sletterød, kand. filol. Honoratus Bonnevie, kapitano B. Johns Klingenberg († 28/4 1920).

En Bergen »Societo de E-istoj« fondiĝis 22/3 1909. Prez. lektoro Einar Schibbye († 16/1 1931), s-ino Falkenberg, inf. kapitano Eriksen, komercisto Conrad Croepelien († 1924). En 1912 la komerca gimnazio en Bergen nomis E elektebla lingvo, kaj lektoro Schibbye instruis E-n al 15 gimnazianoj. En 1918 la prezidanto forlasis Bergen, la klubo ekdormis kaj ĝis nun (1933) ankoraŭ ne restariĝis.

En Trondheim Grupo E-ista refondiĝis 6/2 1911 (Prez. R. Rian), kaj novaj grupetoj elkreskis en Stavanger februaro 1910 (prez. H. Wiig), kaj kursoj en Haugesund (Nils Økland), en Trondheim (Joh. Lövli) kaj en Kristiania (f-ino Finholt) kaj inter blinduloj (Brochmann Sletterød, Bonnevie kaj Rosa Bye).

Dum la komenca periodo aperis krom la »ABC« kelkaj aliaj libroj ellaboritaj de la ĝis tiam ĉefa gvidanto, H. Th. Thomsen, lernolibro, 1907, ĝia dua eldono 1909 (10-a milo); prozo el danaj-norvegaj aŭtoroj, trad., 1908.

Jam de komence la e-istoj sentis

bezonon de prop. gazeto kaj en julio 1908 stariĝis komitato por eldoni tian gazeton sur bazo de akcia societo. La komitato konsistis el: f-ino Finholt, kapitano Klingenberg (prez.), lektoro Schibbye kaj H. Th. Thomsen. Poste aliĝis f-ino Rosa Bye kaj ing. Bj. Simonsen, sed baldaŭ ekstis inter la komitatoj gravaj opini diferencoj kaj la laboro ĉesis. Tiam Thomsen — sole respondeca — eldonis 1/1 1909 la unuan n-ron de »N Gazeto« (Norsk E-blad). Poste fariĝis red. Schibbye. La gazeto aperis monate regule — en 1909 kun 12 n-roj. De 1910 en nova pligrandigita formato kaj sub nova nomo, NE-isto. Aperis en 1910 nur 5 n-roj. La ekonomio daŭre estis malforta kaj de 1/1 1911 la gazeto transiris kiel proprajo de la ĵus fondiĝinta NE-ista Ligo sub redaktado de H. Th. Thomsen kaj Engesgaard Christie. Aperis en 1911 4 n-roj, en 1912 ĝis fino de 1914 pojaroj 6 n-roj. Tiam la gazeto ĉesis aperi kaj restis neeldonita dum 7 jaroj.

En 1921 NEL interkonsentis kun la sveda gazeto »La Espero«, Gävle, pri aparta kolono en tiu gazeto pri la norvega E-movado, sed tiu aranĝo montriĝis ne kontentiga kaj ĉesis. La multobligita cirkulerforma gazeto, kiun NEL eldonis regule monate en 1922, ankaŭ ne estis kontentiga, kaj finiĝis je la fino de la jaro.

II. La organiza periodo. Ĝis 1910 la E-movado en N. konsistis krom la Klubo E-ista en Kristiania el kelkaj malgrandaj parte jam dormantaj grupoj en Bergen, Trondheim kaj el disa izolularo. En redakcia artikolo (N. E. n-ro 1—1910) E. Christie proponis fondiĝon de Norvega Societo por Propagando de E. »Se oni rigardas al la E-movado en nia lando, oni trovas, ke ĉe la fino de 1909 ĝi staras je la sama nivelo kiel ĉe la fino de 1908. La ĉefa kaŭzo de tiu ĉi ege malrapida disvastiĝo estas nescio de la lingvo, ĝia historio kaj nuna progreso, kaj manko de laŭplana kunlaborado.« Lia propono trovis iom da atento, kaj post plua ellaborado de la plano fondiĝis la 27/1 1911 Norvega Esperantista Ligo (NEL). Ĉeestis en la fondiĝa kunveno f-ino Finholt

(kas.), prof. Alf Torp († 26/9 1916), H. Bonnevie (sekr.), Christie (prez.), Fr. Lindquist, Brochmann Sletterød kaj H. Th. Thomsen. 58 E-istoj estis aliĝintaj laŭ antaŭe dissendita alvoko, kaj fine de la jaro NEL havis 76 membrojn.

En 1912 aperis lernolibro de E. Christie, 76 p. Tuj poste li elmigris al Seattle, Usono. En sama jaro 26/6 H. Th. Thomsen elmigris Kanadon kaj f-ino Finholt jam fine de 1911 entreprenis unujaran vojaĝon al Azio. NEL perdis pro tio 3 el siaj ĉefgvidantoj, kaj tio grave influis je la laboro en la postaj jaroj. Tamen NEL aperigis febr. 1913 flugfolion en 10 mil e-roj, kies tekston skribis Christie antaŭ sia elmigro.

La gvidadon de NEL transprenis H. Bonnevie (prez. 1912—13), E. Schibbye (1913—18), Bruno Rifling 1918. Per li NEL akiris novan sangon. Estante juna, energia studento de filologio, li kun idealista kredo kaj kun senlaca entuziasmo kaj laboro oferis al E ĉiujn liberajn minutojn. Sep. 1918 li estis elektata prez. de NEL kaj samtempe li aperigis novan lernolibron kompletan en 5 mil e-roj. Du monatojn poste antaŭ Kristnasko li mortis subite pro »hispana malsano« (22/12 1918). En marto 1921 ankaŭ mortis f-ino Finholt, dum 12 jaroj la plej agema kaj fervora e-istino en N. La morto de tiuj du gravaj gvidantoj estis forta bato por la organizo kaj la movado entute. Printempe 1919 fariĝis prez. de NEL ĉefleŭtenanto R. Bugge Paulsen, kiu ankoraŭ prezidas.

La presita gazeto NE-isto per sia decembra numero 1914 ĉesis kaj reaperis nur en 1923 sub redaktado de Bugge Paulsen kaj Bonnevie. El la gazeto aperis en 1923 4 kajeroj, en 1924 2 duoblaj 4-paĝaj n-roj kaj tiam denove ĉesis, ĉi tiufoje pro incendio ĉe la presejo.

La fondiĝo de NEL 1911 kreis de komence ioman vigligon de la movado. Grupo E-ista en Trondheim refondiĝis 6/2 1911, Klubo E-ista en Kristiania restariĝis 30/9 1912, nova grupeto ekfunkciis en Stavanger (H. Wiig) febr. 1910, kaj novaj kursoj ekfloris en Haugesund (Ökland), Stavanger (Wiig), Trondheim (Lövh,

Njaalsund kaj en Kristiania i. a. kursoj por blinduloj 1910 (Brochmann Sletterød) kaj Bonnevie, 1912 (Rosa Bye).

Klubo E-ista en Kristiania en 1914 aliĝis kiel filio de NEL, poste endormis kaj denove restariĝis 28/11 1916 (prez. Björn Ottesen).

En 1915 (1 sep.) fondiĝis E-Asocio de norvegaj geinstruistoj (prez. Rosa Bye, sekr. J. Finholt). Ĝi havis 30 membrojn en 1923, kiam la asocio ĉesis la 13/9.

Ĉe la fino de 1920 ekzistis E-grupoj kaj kluboj en Kristiania (3), Trondheim, Bergen, Rjukan kaj Kristiansand (Alf Christensen).

III. La renesanca periodo. NEL, kiu de 1924 estis sen organo kaj pro tio preskaŭ sen membroj kaj sen enspezoj daŭrigis sian prop. laboron, ĉefe gvidata de R. Bugge Paulsen (prez.) kaj Arne Arnessen (kas.). Printempe 1928 estis invitata pastro Cseh, kiu tiam kursis en najbara Svedlando, por fari prelegon en la universitato. Ankaŭ en la radio li parolis. Li vizitis kelkajn aŭtoritatojn, inter ili la prez. de la 2 tutlandaj geinstruistaj asocioj, ĉefinstruisto A. Kirkhusmo kaj s-ino Anna Sethne. Tiuj du kune la prez. kaj kas. de NEL fondis printempe 1930 komitaton kiu nome de la norvega sekcio de la Mondasocio por Nova Edukado invitis pastron Cseh por gvidi kurson en Oslo dum junio-julio 1930. Tio estis la komenco. Pastro Cseh venis, gvidis kaj venkis, kaj lia vizito donis al la gvidantoj novan kuraĝon. La unuan Cseh-kurson sekvis longa vico da novaj kursoj dum 1931—1932, kiujn organizis por NEL A. Arnessen. Jen statistika parto pri la renesanca periodo:

Per 3 Cseh-instruistoj, hungara d-ro inĝ. Ottmar Fischer, estona lektoro Henrik Seppik kaj norvega karavanestro Jens Schjerve okazis de sep. 1931 ĝis fino de 1932: en 13 urboj 29 kursoj kun ĉ. 1600 partoprenintoj, inter ili pli ol 300 geinstruistoj. — Proporcio de la gazetara statistiko montras: 1922 — 74 artikoloj, 1925 — 43, 1928 — 72, 1930 — 204, 1931 — 362, 1932 — 616. — Je la fino de 1932 e-istoj estas konstatablaj en pli ol

225 lokoj (laŭ Dietterle 122); 18 E-kluboj kaj grupoj fondiĝis kaj 2 reorganiziĝis, ĉiuj aliĝintaj al NEL. — La kursanaro laŭ okupoj konsistis el: geinstruistoj 17%, lernantoj ĉe gimn., mez- kaj popol-lernejoj 8%, ĉiuzpecaj geoficistoj 49%, univ. ekz., inĝ. kaj tekn. 6%, komercistoj, ĉefoj kaj estroj 9%, div. inaj oficoj 6%, kampara laboro 5%.

Krom tiuj specialaj kursoj okazis multaj kursoj, gviditaj de aliaj personoj. Menciindaj estas 4 kursoj de Bugge Paulsen inter policistoj kaj kursoj por geinstruistoj, gviditaj de Arne Arnesen dum la somero 1931.

Paroladoj pri E estis en ĉi tiuj jaroj multnombraj. Parolis ĉefe Bugge Paulsen, Alf Christensen kaj Arnesen.

La unua rezolucio favora al E estis akceptata 1931 de jarkunveno de geinstruistoj el Buskerud kaj Vestfold distriktoj post parolado de Arnesen.

De 1/1 1932 la prop. organo reaperis sub nomo 'Esperantobladet', redaktita dum 1932 de Bugge Paulsen kaj Bonnevie kaj de 1/1 1933 estas red. konsulo Alf Christensen, Kristiansand.

Dum 1924—31 neniu jarkunveno de NEL okazis. La nova periodo postulis plenan reorganizon de la metodoj kaj provizora jarkunveno estis kunvokita la 4/11 1932. Tie estis diskutataj novaj linioj por la prop. laboro, starigo de novaj fakoj, elekto de ĝen. sekretario, ktp. La estraro estis reelektata kaj konsistas je la fino de 1932 el: R. Bugge Paulsen (prez.), Arnesen (ĝen. sekr.), kand. filol. H. Bonnevie (rap. sekr.), sekcia ĉefo Bj. Ottesen (kas.) kaj instruistino Rosa Bye (ano).

Dum 1931-32 diversaj fakoj ĉe NEL estas rekonstruitaj kaj reorganizitaj: libra fako, kurs-aranĝa fako, eldona fako, ekzameno-fako, klublabora fako ktp. Ĉio ankoraŭ ne kontentige funkcianta, sed per helpo de multaj novaj fervoraj e-istoj NEL certe sukcesos solvi la restantajn problemojn kaj malfacilaĵojn.

Ankoraŭ menciinde estas, ke de la unua radioparolado el Oslo 1925 (Bugge Paulsen) kaj kurso en radio 1928-29 (Bugge Paulsen) la estraro de la

radiostacio en 1932 konsentis al NEL ĉiumonatan paroladon pri aŭ en E.

La norvega registaro sin oficiale reprezentis 10-foje ĉe la UK-oj, en 1907, 1909, 1911, 1926—1932.

La Nacia Oficejo de Turismo en N. konsentis 1932 presigi en 10 mil e-roj aldonan folion 2-paĝan (en E) al ĉiuj eksterlande dissendotaj broŝuroj pri turismo en N.

Grava okazintaĵo komence de 1933 estis parolado en la Scienca Societo pri E de prof. Anathon Aal.

Ni eniras en la novan jaron 1933 kun la forta espero, ke la norvega E-movado per la lastjara antaŭenmarŝo akiris sufiĉe solidan bazon por daŭra kaj ĉiama progresado.

ARNE ARNESSEN.

Notlibro de Praktika Esperantisto.

El la... Originale de K. R. C. Sturmer. 1934, 130 p. Interesaj pensoj kaj konstatoj el ĉiuj terenoj de la vivo, ankaŭ el la vivo de E-istoj, verkita en taglibra formo. Aranĝis por preso: V. Bleier, K. Kalocsay kaj L. Totsche.

Nova Esperanto-Biblioteko. Kolekto de originaloj kaj tradukoj el la germana literaturo. Formato 16×10½ cm. Eld. Ellersiek kaj Borel (Berlin). La n-roj 1—4 estis primilitaj germanflankaj publikigaĵoj. Ĝis nun aperis 10 n-roj.

Nova Gramatika Libro de la int. helpa lingvo E por la supera kurso. Aŭtoro: Stama'iadis. 1928, 187 p. »Bonega verko, respegulanta konscian amon al la lingvo, precizecon en la scio kaj taŭgan sistemon en la instrumentado.« (Jobo, Hungara Heroldo, 1929, A. 1.) Kelkaj partetoj en la Enciklopedio.

Novaj Amaj Poemoj. Originale de Jaime Grau Casas. 1927, 32 p. »La aŭtoro... per sia neregula ritmo, kaj ankaŭ per la formo de l' poezioj, tre proksimiĝas al la franca senritma verso. Delikataj priamaj sopiroj.« (G. S., E', 1927, p: 65.)

Novaj Versaĵoj de Lermontov, el la rusa trad. Bela Manto (Mirski). 1912, 92 p. »La tradukinto ĉiam konservis la originalan ritmon. Precipe la traduko de Borodino estas admirinde bela.« (Kozlowski, Ondo de E, 1912, p: 197.) »Vera modelo de bone aranĝita libro.« (N. K., L. I., 1913, p: 468.)

Nova Kulturo. v. Novspirito.

Nova Sento. Romano, originale de Tagulo, (ps. de H. B. Hyams.) 1915, 158 p. kun ilustraĵoj, presita sur pale-verda papero per brunaj literoj. Tendenco romano, sceno sur la Marso, inspiroj de teozofio kaj vivreformaj ideoj.

Novaj Tempoj. Revuo de popoledukado. Estis organo de TAGE. Aperis de dec. 1921 ĝis 1926, ĝin sekvis Int. Pedagogia Revuo. Red.: Vittecoq, Habert, Müller, Piütze; adm. Goldberg. Formato 28X23.

Novák Rudolf, ĉeĥoslovako, ĉefing. de elektraĵ entreprenoj de Plzen. Nask. 18 febr. 1882 en Kročehlavy. Prez. de la Plzen-a klubo. UEA-del. de 1920. Prop. per prelegoj kaj artikoloj.

Novejarque (noveĥarke) Angel hispano, verkisto de logogrifoj kaj ŝak-problemoj por diversaj H-gazetoj, loĝis en Valencia, mortis. Red. de 'La Suno Hispana'.

Noveloj. De Sienkiewicz, el la pola trad. Lidja Zamenhof. 1925, 64 p. »Kvin noveletoj. Plej originalaj estas tiuj, kiuj priskribas polajn tipojn kaj morojn. Traduko tre komprenebla kaj vigla.« (G. S. 'E', 1925, p: 218.)

Novial. Ahlberg, siatempe sveda Ido-ĉefo, propagandas nun la lingvosistemon N. individue kreitan de prof. Jespersen en 1928. Laŭ la N-istoj, N. ne havas la »kaosajn« elementojn de E, sed ĝi ja tute ne estas akomodita por ĉiuj fakoj, en kiuj E jam estas elprovita kaj uzita.

Novljan F., kroato, prof. en Nova Gradiška. Publika aganto. Verkis metodikan lerno- kaj legolibron. Prop. isto.

Novspirito (Universala Blanka Frataro.) Religieema socialisma instruo de la bulgaro Petro Danov, laŭ kiu la senmorteco estas perdita kapablo de la vivo, kiu povas kaj devas esti reakirita per la revekigo de la konscio. Laŭ la instruo de Danov ekzistas miloj da estaĵoj pli superaj kaj raciaj ol la homo, — la Universala Blanka Frataro, — kiuj posedas ĉi tiun potencon; ili estas adeptoj de Dio kaj majstroj kaj gvidantoj de la homoj. La novspiritanoj vivas komunecan vivon; estas ilia opinio, ke pli grav-

as la kvalito de la anaro ol la kvanto, tial ili oficiale ne faras iun propagandon. Tamen kelkaj individuaj personoj agas ankaŭ propagande je propra risko kaj kosto. Ankaŭ E estas adoptata kaj uzata: de 1928 aperis pli ol 25 prelegoj de Petro Danov en du serioj en la kolekto 'Nova Kulturo'. La tria serio nun estas aperonta. De 1932 aperas en la sama eldono la gazeto 'Frateco'. Laŭ A. NIKOLOV.

Nov-Zelando. Roland, St. Clair, pastro G. Aldridge estis la plej fruaj kaj plej konataj pioniroj, precipe la lasta, kunfondinto de NZEA kaj dum multaj jaroj ĝia prez. La unua ES estas fondita 5 dec. 1904 en Auckland, prop. artikolojn tiutempe presis 'The Otago Witness'. En 1906 S. White en Christchurch fondis ES-n kun pli ol 100 membroj. Samjare aperis EK en Dunedin kaj Invercargill kaj en 'Weekly Press' ĉiusemajne aperis kursoj kaj ekzercoj de E. Gravan subtenon al la movado donis la ĉefministro Joseph Ward, kiu en 1907 mem faris bonegan paroladon pri E kaj konsilis instrui ĝin en popolaj lernejoj kaj ministro de popola klerigo, kiu ankaŭ favore rilatis al E. Laŭ la Dietterleh-statistiko en 1928 E-istoj troviĝis en 72 lokoj. Laŭ la ICK-raporto en 1930 NZEA »laboras tre vige kaj sukcese.« UEA-del. en 1933 en Auckland, Christchurch, Wellington kaj Whangarei. I. SIRJAEV.

Nunes (nunŝ) Adolf August, portugalo, bankoficisto. Nask. 8 apr. 1895 en Porto. Gvidis kursojn en Lisboa kaj Porto, verkis artikolojn.

Núñez Dubús (nunjez) Amalia, hispanino, help-prof., telegrafistino. Nask. 22 marto 1889 en Pamplona. E-isto de 1911. HEI-ano. Kursoj; kunlaboro al kelkaj E-revuoĵ, ankaŭ al L. M.

Nuntempaj Rakontoj. De G. P. Stamatov, el la bulgara trad. Krestanoff. 1922, 80 p. »S. estas ironiisto kaj pesimisto. Rapida sinsekvo de l' agoj aŭ diroj. Flua, viva stilo de l' tradukanto.« (G. S. 'E', 1922, p: 219.)

Nürnberg. Urbo en Germanujo (Bavarujo); 415.500 loĝantoj. En dec. 1888 la ĝis tiam Volapükista 'Nürnbergger Weltsprache Verein' decidis aliĝi al E kaj tiel tiu ĉi societo estis la unua E-

ista organizaĵo, en kies kadro laboris ankaŭ L. Einstein. En okt. 1889 aperis tie la unua E-gazeto „La E-isto“, eld. de Ch. Schmidt. Ankaŭ la Biblioteko de la lingvo int. E' estis presata en N. ĉe W. Tümmel. — **Urbo** de la 15-a UK 2—8 aŭg. 1923, 4963 enskribintoj (laŭ Privat almenaŭ 4000 partoprenantoj) el 43 landoj. — 8-a Int. Katolika E Kongreso en 1923.

Nur Volu. Originale de Izgur. 1924, dua eld. 1927, 47 p. »Li energie vokas la tutmondan proletaron al tuja revolucio.« (G. S. „E“, 1928, p. 106.)

Nutters. Wiebe, nederlandano, tipografiisto, poste ĵurnalisto. Nask. 24 aŭg. 1872 en Leeuwarden, mortis 6 dec. 1926. Kvankam simpla laboristo, li havigis al si multajn sciojn, lernis fremdajn lingvojn, trad. i. a. verkojn de Victor Hugo en ned. lingvo. E-isto de 1905. Gvidis la lokan laboristan E-an movadon en Amsterdam en la unuaj jaroj. Red. „Arbeider-E-ist“ en 1913 kaj „Int. Socia Revuo“, 1912-14. Prez. de NFLE en 1911. Faris paroladojn, verkis prop. artikolojn kaj lernolibron. Kiel adm. de „Int. Socia Revuo“ li aperigis serion da socialistaj broŝuroj en E.

Nylén (nilén) Paul Axel, ŝvedo, redaktoro ĉe »Stockholms-Tidningen.« Nask. 20 jun. 1870 en Tillinge apud Enköping. Estis ĉefred. de ŝveda polica gazeto, 1906—20, tradukis al la ŝveda diversajn librojn. E-isto de aŭg. 1892, ano de Klubo E-ista en Uppsala de 1893. Kunlaboris al LI de ĝia komenco en dec. 1895, ĝia red. 1897—1901. Eldonis laŭ komisiono de Z liajn prop. broŝurojn portugalan kaj holandan, 1896, laŭ komisiono de ES Espero en Petrograd anglajn bro-

ŝuron kaj lernolibron de Geoghegan, 1898. Multe korespondis kun Z, Gernet, Trompeter, Ostanjeviĉ, Lengyel, Méray ktp. Gvidis kursojn. Vicprez. de la EK en Uppsala kaj Stockholm, kunfondinto de SEF, 1906, post ĝia rekonstruo 1909 ĝia vicprez. kaj de 1918 ĝia prez., nun honora prez. (sed aktiva). Prez. de EG en Stockholm 1909—28. Prezidis la Skandinavan Kongreson de E en Göteborg 1918. Prof. diplomo de la Int. Instituto de E, 1910, ktp. Partoprenis 8 UK-ojn, inter ili ankaŭ la unuan kaj duan. Membro de LK de 1905, akademiano de 1908, ĝia vicprez. de 1933. Ŝveda reprez. en KR. Honormedalo de ICK, 1933, ktp. Verkoj: „Ŝveda lernolibro“, 1896, 8-a eld. 1927; „E-S Vortaro“, 1897; „S-E Vortaro“, 1899; „Ŝveda ŝlosilo“, 1906 kaj 1931; „Por E“. 1908; „Fraŭlino Julie“ trad. de Strindberg, 1908 (prezentita de ŝvedaj profesiaj geaktoroj en Dresden); „Eksperimento Eccles“, 1908; „Sonoj kaj vortoj de E“, 1930; kunlabore kun Engholm trad. de „Per balono al la poluso“, 1930; „Jubilea matrikulo de SEF“ (granda parto) 1931; plena, scienca „E-S Vortaro“, 1932; svedlingvaj prop. broŝuroj. Estis red. de S-E gazeto „La Espero“, 1918—20 kaj 1927; konstanta kunlaborado. Kunlaboris al multaj aliaj gazetoj. Ĉefkunlaboranto de la Ĝenciklopedio.

Nyssens (nizens) Paul, belgo, verkisto kaj eldonisto. Nask. 8 nov. 1870. Li fondis en 1906 Instituton (por homa kulturo) imitante Usonajn Institutojn. Trad. al la franca 9 usonajn librojn kaj verkis mem 14 francajn librojn; unu el ili li E-igis: „Bonhumoro“, 1933.

Oba (ooba) Joŝifuĝi, japano, mara oficiro. Nask. 10 jul. 1886 en Hukuo-oka-ken, mortis 28 dec. 1925 en Tibaken. Verkis „Maristan Terminaron“ (E-I kaj J-E), 1922.

Oberrotman Adolf, oficisto en Varsovio. Nask. 20 febr. 1893. Tre aktiva E-isto. Dum 1917—25 del. de UEA. Nun reprezentanto de multaj E-aj revuoj kaj movadoj. Kunlaboris en multaj E-aj gazetoj. Aparte eliris de li (kune kun Jung) „Lastaj Tagoj de D-ro L. L. Zamenhof.“

Obrostsoff Vadim' Victor, kanadano, radioteknikisto. Nask. 1897 en Rusujo. E-isto de 1914. Aŭtoro de multaj poeziaĵoj en E. Prez. de Kozmodemianska EG 1915; prez. de Kazana ES 1917—23; dir. de Kazana E Instituto; prof. de E en Kazana Univ. kaj Kazana Kom. Univ.; gvidinto de E-kurso en Harbin (Manĉurio); fondinto de EG en Edmonton, Grande Prairie kaj aliaj lokoj en Prov. Alberta (Kanado).

Occidental (okcidental). Lingvoprojekto, kies aŭtoro estas E. de Wahl, 1922. Fleksia lingvo de »okcident-eŭropa kulturo.« La forlaso de la perfekte aglutina principo, la rompo de la radik-neŝanĝebleco de radikoj kaj vort-elementoj, la esence eŭropa limigiteco de la lingvo malhelpas al ĝi penetri en la neokcidentajn landojn. Ĝia nekompareble pli granda malfacileco rilate al E, ĝiaj pli malgrandaj elaboriteco kaj praktika elproviteco, la manko de tia ampleksa aplikado, kia jam estas atingita de E, kaj fine la principoj de la individua »lingvo-diktaturo« faras ĝin tute fremda al la vastaj amasoj. Krome, la diversaj sistemoj plej energie kon-

traŭbatalas unu la alian, kio estas bone komprenebla el antagonismo karakteriza pri individuaj klopodadoj. Wahl nomas la sistemon Interlingua — lingvo esence itala; la interlingvistoj nomas la sistemon Occidental — lingvo de l' Entente-imperialismo, ktp.

O'Connor James Charles, irlandano, d-ro fil. Nask. en Cork, mortis 75-jara en Faversham, Anglujo. La lastan duonon de sia vivo li dediĉis grandparte al E kaj ĉie prelegis kun apostola fervoro. Lia lernolibro estis dum jaroj preskaŭ la sola instruilo por angloj. Redaktis monatan gazeton „La E-a Instruisto“.

Odusceias. Eposo de Homeros, el la antikva greka trad. W. J. A. Manders. 1933, 294 p. »Unu el la ĉefverkoj literaturaj de la homaro. La traduko estas bonega. La tradukanto anstataŭ konservi la versan formon, tradukas en prozo kaj tiel povas adapti ĉion al la nova lingvo.« (F. G., Espero Katolika, 1933, p: 140.)

Ofret (ofre) Albert, franco, prof. de mineralogio ĉe la Univ. Lyon. Nask. en 1857 en Douai. Delegito de Francujo en pluraj kongresoj. En 1911 kreis en Beyrouth francan instruadon. En 1927 klopodis por kreo kaj pligrandigo de la Muzeo de Ampère en Poleynieuw (apud Lyon). Jam en 1901 li verkis serion da artikoloj pri E en grava ĵurnalo »Lyon Républicain«. En 1902 li organizis ĉe la Scienco Fakultato de Lyon la neforgesblan paroladon de Boirac, kaj je la morgaŭa tago, sub la patronado de „Touring-Club“ malfermis la unuan kurson antaŭ pli ol 500 aŭdantoj. Li kunfondis la brilan Lyon'an grupon, kies sekr. li restis ĝis 1914. Li estis

la raportanto de la enketo de la Lyon'a grupo pri la »divstavigo de E en la mondo«, 1904.

Oficiala Gazeto E-ista, estis la organo de la E-ista Centra Oficejo (CO). La unuaj paĝoj de la kajeroj de OGE ĉiam enhavis la oficialajn komunikaĵojn (ekz. lingvaj demandoj, preparaj kaj findokumentoj de la UK-j, proponoj kaj diskutoj ktp.) kaj la restanta parto sciigojn de la CO kaj la E-aj ligoj, asocioj ktp., listojn de societoj, oficejoj ktp., sciigojn pri gazetoj, li eraĵuro kaj diversajoj. Krom verda kovrilo ĉiu kajero enhavis 4—8 verdajn kromfoliojn kun anoncoj kaj negravaj sciigoj. Red. generalo H. Sébert kaj G. Chavet. Entute aperis de junio 1908-majo 1920—77 kajeroj en 7 vol. 313, 287, 391, 422, 282, 24, 190 p. da teksto kaj multaj kromfolioj, 25×16, de jan. 1921-jan. 1922—4 kajeroj (6 n-roj.) 4×IV+192 p. 24×16. v. Esperantista Centra Oficejo.

P. TARNOW.

Oficiala Jarlibro de la E-movado. Kun tiu ĉi titolo de 1924. Unu el la plej gravaj manlibroj en E, eldonaĵo de UEA. Red. ĝis 1920 H. Hodler, poste H. Jakob. La jarlibroj enhavas la adresojn de la delegitoj, informojn pri la tuta E-movado, artikolojn pri la historio, literaturo, movado de E, krome aliajn artikolojn, precipe instruajn kaj dokumentigajn, kiuj povas interesi la int. legantaron. La suba tabelo montras la paĝonombron de la jarlibroj.

1908	23	1923	280
1909	539	1924	400
1910	279	1925	468
1911	157	1926	428
1912	198	1927	512
1913	310	1928	608
1914	354	1929	480
1916	132	1930	406
1920	230	1931	420
1921	234	1932	320
1922	284	1933	452

Nombro de la e-roj — 1903 : 1250, 1913 : 7000, 1920 : 4000, 1925 : 10000, 1930 : 10000, 1933 : 9000. (I. Jarlibro 1933, p: 56 kaj 102—103; BIL, p: 441—442.)

Oficialaj vortoj. Tiaj estas, krom la

vortoj de la Fundamenta vortaro, la vortoj oficialigitaj de la Akademio en la »Aldonoj al la Universala Vortaro«. Ĝis nun oni kunmetis kvar tiajn Aldonojn (1909, 1914, 1921, 1929). En 1930 aperis en la redakto de Grosjean-Maupin la Plena Vortaro, kiu enhavas multajn vortojn neoficialajn, sed grandparte ĝenerale uzatajn. Kvankam ĉi tiu vortaro estis nur prepara laboro por la Plena Vortarego (revo de Z) kaj ne volis havi oficialan karakteron, la plejparto de la verkistoj ĝin rigardas kvazaŭ oficiala. KALOCSAY.

Oficiala Klasika Libro de Esperanto. Red. Grosjean-Maupin. Franca-angla-germana parto, 1924, 120 p., i a'a-hispana-portugala parto 1927, 118 p. Vortaroj de la oficialaj radikoj kun nacilingvaj tradukoj. »Libro pli oportuna uzebla, pli preciza, pli plena, ol la iama Universala Vortaro.« (G. S. „E“, 1925, p: 5.)

Ogata Tomosaburō, (-roo), japano d-ro med., prof. de fiziologio en Imp. Univ. de Tôkyō. Nask.: 31 jan. 1883 en Ōsaka. E-isto de 1923. Du med. raportoj pri rizmalsano originale en E, 1925. — (Kuw.)

Ohaŝi (oo-) Unokiĉi, japano, komercisto. Nask. 27 okt. 1889 en Yokosuka. E-isto de 1906. Pionira laboranto en Y., lulila loko de J E-movado. — (Kuw.)

Ohlsson (ulson) Carl Emil, svedo, fil. magistro, ŝtatlerneja instruisto de modernaj lingvoj. Nask. 18 okt. 1885 en Malmö. E-isto de 1904 kiel gimnaziano per legado de artikolo de P. Ahlberg. Estis estrarano de SEF. Sekr. de SEI 1932-33. Vojaĝis tre ofte en eksterlando pere de E. En 1927 faris E-paroladojn pri Svedujo en 35—36 lokoj de Ĉeĥoslovakujo kun lumbildoj kaj filmo. Kursoj, artikoloj. Verkis lernolibron laŭ ideogramatiko, 1925, S-E kaj E-S poŝvortarojn, 1928.

Ohshima (ooŝima) Hiroshi, japano, prof. de agronomia fakultato de Imp. Univ. de Kysyu. D-ro scienca. Nask. 5 nov. 1885 en Ōita-si. Verkis: »Hermafrodita Marstelo, Asterina botheri Goto«, Annotationes Zoologicae Japonenses, Vol. 12, No 1., 1929.

Oishi (ooiŝi) Wasaburo, japano, meteorologo, dir. de Aerologia Observatorio de Tateno. Cefdir. de JEI Nask. 15 marto 1874 en Tosu, Sagaken. E-isto de 1910. Komitatano de ISAE. Eldonis dikan, grandformatan (30×22 cm.), nur E-an Raporton de la A. O. de T., No. 1. (1926) — No 6. (1931), entute 1246 paĝojn. Kuraĝa E-pioniro sur scienca kampo.

Ojala Leo Konrad, finno, komercisto (importo kaj eksporto). Nask. 16 nov. 1891 en Helsinki. E-isto de 1918. Kursoj. E-a sekr. de F-a Foiro 1922—23, red. „Ekonomiaj Fortoj de F.“, 1922.

Oka Asajiro, japano, eksprof. de alta pedagogia lernejo de Tokyo. Fama biologo. Popularigis Darwinismon en J. Nask. 18 nov. 1868 en Sizuokaken. E-isto de marto 1891, plej malnova J. E-isto. Ellaboris projekton de int. lingvo »Zilengo«, 1890, sed tiam ne publikigis ĝin.

Oka Hidemiti, japano, filo de O. A., zoologo, lektoro de scienca fakultato de Imp. Univ. de Tokyo. Nask. 2 okt. 1902 en Tokyo. Verkis: »Pri la uzado de sufikso um«, La Revuo Orienta, Vol. V., 1924; »Mendelismo« R. O., Vol. VI., 1925.

Okamoto Joŝicugu, japano, instr. en kolegio, ĉefsekr. de JEI de 1933. Diligenta E-logo unuklasa kaj energia laboranto. Nask. 3 marto 1900 en Ayama-gun, Mie-ken. E-istiĝis 1919, estante studento de tria nacia kolegio, Kyoto. 1926—29 kaj 1933-ĝis nun red. de „La Revuo Orienta“. 1930 kun Kawasaki eldonis gazeton „E-ologio“ (J). Verkis: „Fonetika Studo de E“ (J), detala, 1925. Trad. el »Kojiki« (J mitoj, plej malnova historio de J-ujo, kompilita en la VIII-a jarcento), R. O., aŭg., sept. 1925, apr., sept. 1926. Verkis: „Nova Vortaro E-J“, 1926 (preciza, populara, jam pli ol 42 eldonoj). „Nova Vortaro J-E“, en kompostado (la plej multpaĝa el ĉiuj nacilingvaj E vortaroj). Ano de Hermesa Rondeto (farmaciista E-grupo) kaj kunlaboris por »Seslingva Vortareto de Medikamentoj laŭ J Farmakopeo«, 1930, L. K. de 1933. Lia edzino Aiko O. helpegas lin en E-verkado.

Okland Nils, norvego, instr. en

Stord. Nask. 10 jun. 1882 en Valesstrand. Prez. de la komunuma estraro. E-igis pere de sia amiko H. Midthus. En la komenca periodo li multe propagandis inter gekolegoj kaj per artikoloj en la gazetaro. Kursgvidinto en Haugesund 1910 kaj 1912 en Stord 1932 (infankurso).

Okultismo. »Esperanta Psikistaro«, estis iniciita de A. Stas, Antverpeno kaj ĝi celis esti »unuigo por psikisma studado per E« pri hipnotismo, magnetismo, telepatio, spiritismo, k. t. p. Rektoro Boirac skribis en 80 paĝa libreto, kiun eldonis la unuigo per helpo de la Belga Federacio Spiritista en 1910: »E-ismo kaj Psikismo respondas al samaj bezonoj de la homa spirito. Psikisto deziras transpaŝi la limojn de la videbla mondo kaj penetri en pli profundan regionon, kie kaŝiĝas la veraj kaŭzoj kaj principoj de ĉiu realeco. Simile E-isto deziras transpaŝi la limojn de sia nacieco kaj penetri en la spiriton de la tuta homaro.« La unuigo aranĝis kongresan fakkunsidon dum la antverpena UK en 1911, pri kiu aperis raporta kajereto 31 paĝa enhavante ankaŭ la protokolon de tri spiritistaj kunvenoj, kiujn partoprenis 30 E-istoj. La kajero ankaŭ enhavas »psikisman terminaron« kun la plej gravaj fakvortoj. La sekretario de la unuigo estis Stas, kiu aranĝis sukcesan fakkunsidon en Kraków, 1912, sed la tie projektita revuo ŝajne neniam aperis. En 1934 A. W. Thomson fondis Psihan E. Ligon, por kolekti tiujn, kiujn intereseas psiĉaj fenomenoj. En 1913-14 aperis ĉe Davidov en Saratov dumonata bulteno dupaĝa titolita »Okultismo«. La unua tiaspeca verko estis certe »Libreto pri transmorta vivo« de G. T. Fechner, aperinta en Parizo en 1907. Dum la milito aperis de fama ĵurnalisto W. Stead »Kial mi scias ke mortintoj revenas« en 1917 en Boston. Du kajerojn pri sama temo verkis J. Thiebault. Unu el ili aperis, kiel aldone de HDE en 1925 kaj aparte francan kaj E-e en dekmil-e-roj, tri eldonoj. Lian kajeron pri la mortinta amiko tradukis E. Grosjean-Maupin. Pri okultismo ĉiam interesiĝis ankaŭ eminentaj E-istoj. Membroj de la diversaj similtendencaj mo-

vadoj, kiel Bahaa Movado, Oomoto, Nova Spirito, La Blankaj Fratoj en Bulgariujo, Ruĝkrucanoj, Swedenborganoj kaj Teozofoj uzas E-n en siaj eldonadoj, kelkaj el ili eĉ en kunvenoj. La estraro de la Nederlanda Societo de Spiritistoj, »Harmonia« eldonis E-an flugfolioon »La Spiritisto« en 1928. Pri la lasta okultisma kunveno ĉe UK-j ni scias el 1923, Nürnberg. Poste nur la diversaj supre nomitaj movadoj aranĝis apartajn kunvenojn. D-ro Privat rakontas, ke la lasta manuskribo de Z, nefinita, estis plano de artikolo pri senmorteco de l' animo. P. BALKÁNYI

Olden O. F., norvego, gimnazia rektoro en Stavanger. Konata pacifisto, prez. de la N. Pacasocio de 1930, red. de pacifista gazeto. E-isto de 1920. Prez. de la klubo »La Tagiĝo« en S. 1922, gvidis en 1923 kursojn kaj instruoj »per lumbildoj«. Reaktivigis 1932, kunaranĝinto de la Cseh-metoda kurso gvidata de Sep-pik, 1932.

Oliván Hernando Salvador, hispano, oficiro de la kuracisthelpantaro de la mararmeo. Nask. 16 apr. 1889 en Cinco Olivas (Zaragoza). E-isto de 1928. Gvidis kursojn, fondis 2 grupojn.

Omlor August, germano, distrikta prokuroro. Nask. 13 marto 1888 en Breitenbach. Multe laboris en klerigaj unuigoj, paroladisto kaj verkanto de dialektaj poemoj. E-isto de 1905, aktivulo de 1910. Fondis en 1911 la EG en St. Ingbert, en 1913 EL por Saargebiet kaj Westfalz, en 1923 kunfondis EL Saarteritoria. Multaj ekspozicioj kaj prop. paroladoj. UEA-del. de 1911, ĉefdel. 1924. Red. de »Okultismo« en 1913/14. Historio antaŭmilita de E en S. en manuskripto ĉe GEI.

Onnen M. F., nederlandano. Mortis 64-jaraĝa en Hago 25 jun. 1933. Dum pluraj jaroj ĉefdel. de UEA. Fervora kaj diversflanka laboro por E.

Oohaŝi Kaiziro, (ps. Oohaŝi Rendo), japano, pentristo de akvarelo per ĉina inko. Nask. 2 aŭg. 1897 en Tôkyô. Studis ekonomion en Keiô Univ. E-isto de 1928. Fondinto de »Argenta Kunsido«, tre fama kunsido de babilado. — (Kaw.)

Ooi Manabu, japano. Nask. 22 apr.

1887 en Hirosima-si. Unue nomiĝis Takabatake, de 1920 Ooi. Estro de laboratorio. Administris internajn aferojn de la oficejo de JEI, kies dir. li estis.

Oojama Tokiŭo (E-e E. T. Montego), japano, taksiaŭtoposedanto. Ĉefkomitatano de Korea EI. Nask. 15. febr. 1898 en Koriyama-si, Hukusima-ken. En 1925 eldonis gazeton »La Orienta Lumo«. Ĉefa, laborema aganto en Koreujo.

Oomoto. El religiscienca vidpunkto moderna sekto de ŝintoismo kun tute aparta karaktero. La komenco de tiu ĉi spirita movado estis inaugurata per la »diposedo« de s-ino Nao Deguĉi, tiam malriĉa kamparanino. En 1892 okazis la inaŭguro kaj post ses jaroj alvenis la »majstro« Onisaburo Deguĉi (v.), adoptita filo de la »fondintino«. Komence la movado disvastiĝis malrapide kaj la japana registaro miskomprenis ĝiajn celojn. Unu fojon soldatoj eĉ detruis la templo de O. en Ayabe kaj ankaŭ la tombon de la fondintino. Hodiaŭ tiuj persekutoj estas afero de pasintajo kaj O. disvastiĝas kaj evoluas pace.

Enkonduko de Esperanto. Jam antaŭ longaj jaroj majstro Deguĉi, ĉefo de O., sciis pri la ekzisto de E kaj deziris ĝin enkonduki, kiam la okazo estos favora. Tiu tempo alvenis en 1923, kiam oni komencis organizi tiujn grandajn kursojn, el kiuj eliris la pioniroj de E-movado inter O-anoj. La unua kurso okazis en Ayabe (Centro de O.), kiun ĉeestis majstro Deguĉi kun centoj da ĉefgvidantoj de O. De tiu tempo konstante E estas aktive propagandata de O-anoj en ĉiuj partoj de Japanujo kaj la kolonioj.

Fondo de UHA. En 1925 fondiĝis Universala Homama Asocio (UHA), kies prez. fariĝis majstro Deguĉi, la vicprez. estas Uĉimaru. La centro de UHA troviĝas en Kameoka, Kioto-hu, Japanujo. La oficiala lingvo de UHA per fremdaj rilatoj estas E. La celo de la Asocio estas »laborado por ideala mondo, per pacaj rimedoj«. En la jaro de la fondiĝo UHA sendis sian propagandiston Koogecu Niŝimura al Eŭropo, kiu fondiĝis en Paris la Eŭropan Oficejon de UHA. Niŝi-

mura laboris en Paris ĝis 1932 kaj poste li daŭrigis sian laboradon en Japanujo.

Esperanto Propaganda Oficejo estis fondata en 1925 por la praktika disvastigo de E en Japanujo. Ĝia centro estas en Kameoka, dir. estas Uĉimaru. Ĝi aranĝas kursojn en la tuta lando, propagandas per paroladoj, radioparoladoj, libroj kaj gazetoj. Ĝi e'donas lernolibrojn kaj vortarojn, starigas lernejojn.

Gazetoj. O. kaj ĝiaj subfakoj eldonas dekojn da grandaj gazetoj, en kiuj O. propagandas ankaŭ E-n. Precipe rimarkinda estas 'Zinrui Aizen Sinbun', kiu aperas trifoje dum monato en Tokio kaj estas legata de pluraj centmiloj. Dum jaroj O. eldonis tri gazetojn en E: 'Oomoto', 'Oomoto Internacia', kaj 'Verda Mondo'. Nun aperas la du lastaj, ambaŭ en rimarkinda amplekso kaj kun varia enhavo.

Centra Oficejo estas en Kameoka, kie troviĝas la granda kaj moderna presejo de O., enhavanta E-fakon kun E-istaj kompostistoj. En la oficejo laboras ĉ. 25 ge-E-istoj, dividitaj en tri fakoj: Oomoto, propagando per E kaj Verda Mondo. E estas vere vivanta lingvo en la O-Teritorio de Kameoka, kie laboras 400 gejapanoj kaj unu eŭropano, preskaŭ ĉiuj komprenas E-n kaj sur la stratoj sonas ĉie nia lingvo. Kursoj kaj kunvenoj okazas preskaŭ sen halto, ĉiutage. Sed ne nur la centro, ankaŭ la regionaj centroj de O., el kiuj estas dudek en Japanujo, estas veraj fontoj de E-ismo.

La aliĝo de O.-movado en Japanujo estis granda puŝo al la ĝenerala E-propagando en la lando kaj dank' al sia eksterlanda propagando per E O. ankaŭ helpas la int. movadon.

Laŭ J. MAJOR.

Ooŝima Joŝio (ps. Takagi-Hiroŝi), japano. Nask. 6 aŭg. 1905. Unu el la fondintoj de J proleta E-movado. Nun eldonadas gazetojn 'Studo pri la Lingvo Int'. (serioza, studema ĉefe pri la ideologioj de la movad) kaj 'E-a Literaturo' (organo de J-a E-Lit. Societo). Trad. al J. »Analiza historio« de Drezon; (el la rusa kun alia persono) »Lingvoscienco kaj Int. Lingvo« de Spiridoviĉ, 1932. Trad. el la ja-

pana 'Forpelataj homoj' (novelo de Koreo), 1933.

Orengo Rinaldo (ps.: Mevo; Kosmopolito; ro), italo, d-ro, inĝ. Nask. 13 nov. 1895 en La Spezia. E-isto de 1920. Kunfondis grupojn en Brindisi kaj La Spezia. Vicprez. de IEF en 1926—28. Fondis en 1930 en Milano la oficejon »E Centro Itala«. Paroladoj; prelego ĉe Somera Univ. en Edinburgh. Verkis pri teknikaj temoj ankaŭ en E. Sub direktado de inĝ. Rosher el S. Francisko, li kunlaboris por la E-traduko de V-a volumo de Schломann-vortaro, kreis sistemon de teknikaj vortaroj »Oro«, akceptitan de la komisiono por konvencia helplingvo de la Unio de Int. Fojroj, tradukis la gvidlibron 'Milano kaj Lagoj de Lombardio' kaj verkis ties fakajn vortaretojn. Tradukajtoj: drama poemo »La Cena delle Befte« de Sem Benelli; poemo kaj prozaĵo de G. Leopardi; »Un Curioso Accidente«, komedio de Goldoni. Poemoj, prozaĵoj, artikoloj en E-revuoj. L. K. Kunred. de 'Lingva Krit'ko', aldono de HDE.

Oreŝkov Georgi, bulgaro, doganperisto, antaŭe telegrafocicisto. Nask. 1864 en Koprivŝtica, loĝas en Burgas. Aliĝis al E en 1899. Eldonis gazeton 'Rondiranto', verkis broŝuron kaj lernolibron en 1900, fondis en Plovdiv E-klubon. Kunlaboris al 'L'E-iste' kaj 'Tra la Mondo'.

Organizo. En la UK 1911 la deziro al int. organizo akiris pli konkretajn formojn. Oni starigis komisionon por studi tiun problemon kaj jam akceptis regularon pri »Rajtigataj Delegitoj«. En la UK 1913 la kongreso akceptis regularon por »Int. Unuigo de E-istaj Societoj« (IUES), al kiu aliĝis diversaj naciaj societoj. Tamen pro eksplodo de la mondmilito en 1914 la IUES neniam aktive funkciis. La UK 1920 reprenis la demandon kaj elektis komisionon por prepari definitivan solvon por tiu problemoj.

En la UK 1922 la jam tiel longe pendinta problemoj pri ĝenerala int. organizo fine trovis praktikan solvon. Malhelpo ĝis tiam estis la iom malsamaj interesoj de la ekzistantaj organoj de la movado. Ĉe unu flanko troviĝis la tiel nomataj Oficialaj In-

stitucioj, grupiĝantaj ĉirkaŭ la Centra Oficejo en Parizo. Ili deziris bazi la int. organizon sur la naciaj prop. socioj, kiuj devus kuniĝi en la int. socio, kia estis jam la en 1913 starigita IUES. La rajtigataj delegitoj, t. e. delegitoj de naciaj socioj, pagintaj certan kotizon, kiuj pro tio havus la solan voĉdonrajton en la kongresoj, baziĝis sur la samaj principoj. Sed aliflanke staris la jam bone organizita UEA kun siaj individuaj membroj tra la tuta mondo, kiu ĝis tiam ne apartenis al la oficialaj institucioj de la movado. Multaj deziris la int. organizon bazitan sur tiu jam regule funkcia int. asocio. Iom da antagonismo inter Parizo kaj Genève kaj personaj influoj malfaciligis dum longa tempo la trovon de kontentiga solvo.

Dum la vojaĝo al Helsinko d-ro Privat, tiama prez. de UEA kaj Chavet, ĝenerala sekr. de la Centra Oficejo, pridiskutis la problemon kaj sukcesis veni al projekto de interkonsento, submetota al la kongreso. Forlasante nun la ideojn pri la antaŭa IUES kaj pri la rajtigataj delegitoj, la UK en Helsinko 1922 venis al la jena organiza sistemo.

Oni kreis novan komitaton, la Konstantan Reprezentantaron de la Naciaj Societoj (KR), konsistantaj el reprezentantoj de la prop. socioj, kiuj pagas kotizon proporciajn al la nombro de siaj anoj. La KR, kiu elektis prezidanton kaj sekretarion-kasiston, havis siajn kunvenojn dum la kongresoj kaj konferencoj kaj prizorgis la rilatojn kaj kunlaboron inter la aliĝintaj naciaj socioj.

Plue UEA estis ankaŭ akceptata kiel oficiala institucio, unuiganta la individuajn E-istojn.

Por ke estu gvida centro por la tuta movado, oni fine fondis Centran Komitaton, konsistantan el 6 membroj diversnaciaj, pri kies elekto KR kaj UEA devas interkonsenti. Do la CK ne enhavis reprezentantojn, elektitajn 3 de KR kaj 3 de UEA, sed ĝi estis grupo de 6 membroj, pri kiuj ambaŭ organizaĵoj devis akordiĝi. La nomo de la CK estis poste ŝanĝata en tiun de Int. Centra Komitato — ICK. Ĝia sidejo estis ankaŭ en Genève.

Ĉar la anoj de ICK loĝis en diversaj landoj, iliaj interrilatoj estis ĉefe skribaj, sed dum la kongresoj ili havis siajn apartajn kunvenojn. Estro de la oficejo en Genève estis ĝenerala sekretario, kiu poste ricevis la titolon de direktoro.

Dum la kongresoj ankaŭ okazis komunaj kunsidoj de ICK, KR kaj la komitato de UEA. Tiuj kunvenoj kvazaŭ funkciis kiel parlamento de la movado, ĉar al ili apartenis la studo de la organizaj problemoj kaj la leĝdonanta povo, antaŭe prizorgitaj de la ĝeneralaj kongreskunsidoj. Post 1928 tiuj komunaj kunsidoj ricevis la nomon de kunsidoj de la »Ĝenerala Estraro«.

Tasko de la ICK estis la ĝenerala gvidado de la movado. Ĝi reprezentis tiun movadon por la ekstera mondo, organizis la kongresojn kun la helpo de la Loka Kongresa Komitato, prizorgis la eldonon de la Oficialaj Dokumentoj, administris centran kason ktp. Siajn enspezojn tiu kazo ricevis el la kontribuoj de KR kaj UEA, el libervolaĵaj subvencioj de tielnomataj patronoj de ICK, kaj el procentajo de la kongresaj kotizoj.

La nova formo de la organizo ne kontentigis multajn. Precipe oni plendis pri la duobleco de la movado, kiu postulis apartajn kotizojn por la nacia kaj la internacia organizoj. Tial la organiza problemo ree aktualiĝis en la UK de Antwerpen en 1928. Oni tie ree elektis komisionon, sed dum la sekvantaj kongresoj en Budapeŝto, 1929 kaj Oxfordo, 1930, oni spertis, ke estis tre malfacile veni al solvo, kiu povus kontentigi ĉiujn partiojn kaj kiu precipe ne postulus tro altajn kotizojn de la membroj. Pro tio oni decidis en Krakovo en 1931 forlasi dum kelkaj jaroj la reorganizan demandon kaj klopodi dumtempe plibonigi la funkciadon de la ekzistantaj organizaĵoj.

Dum la UK de Parizo 1932 la Kontrakto de Helsinko venis al surpriza kaj neatendita morto. En kunveno de KR, kie malnova franca kaj nova brita proponoj estis sur la tagordo, la franca socio venis subite kun nova propono, kiu enhavis kelkajn principojn kun tre vasta tenden-

co pri reorganizo. La plimulto akceptis la proponon malgraŭ energia protesto de kelkaj naciaj societoj kontraŭ tiu procedo.

La akceptita rezolucio simple deklaris la Kontrakton de Helsinki nuligita kaj enhavis decidon pri tasko de UEA, kiu certe estis ekster la kompetenteco de la kunveno de KR.

En sekvanta kunveno de la Ĝenerala Estraro la prezidanto de UEA esprimis sian fortan bedaŭron pro la tiel abrupta rompo de la kontrakto kaj rezervis al UEA ĉiujn rajtojn rilate al la akcepto de la nova statuto, ellaborata tuj post la kongreso de komisiono de 7 personoj.

Dum du jaroj la konsekvencoj de la decidoj, faritaj en Parizo, maltrankviligis la animojn en la E-a movado kaj ofte minacis detrui ĝian internan pacon.

La komisiono, elektita por la ellaboro de la nova statuto, en kiu UEA rifuzis partopreni, finis sian laboron en nov. 1932 kaj proponis la fondon de Universala Federacio E-ista — UFE. Tiu federacio estus organizajo, formota de la naciaj societoj, kiu samtempe transprenus la taskojn kaj grandparte la organizan sistemon de UEA, kaj do ne lasus lokon al UEA kiel memstara organizajo. La UFE formale starigita de la komenco 1933, havis ne tre prosperan kaj mallongan vivon. UEA rifuzis partopreni en ĝi; granda parto de la naciaj societoj restis firme aŭ provizore ekster ĝi kaj nur relative malmultaj societoj, sub la gvido de la ĝisnuna ICK, akceptis la novan organizan formon. En kunveno de UFE en Genève en majo 1933 ĉeestis nur tre malmultaj reprezentantoj de landaj societoj.

La danĝero, ke tiel la movado disfalos en du konkurencajn kaj eble malamikajn partojn, grupigantajn ĉirkaŭ la malnova UEA kaj la nova UFE estis evidenta. Felice dum la sama kunveno en Genève la reprezentantoj de UFE trovis okazon preparoli kun la gvidantoj de UEA kaj per bona volo de ambaŭ flankoj oni venis al »Plano de Genève«, kiu almenaŭ promesis pli bonan ŝancon al harmonia solvo de la problemo.

Kunvenis la Kongreso de Kolonjo en 1933 kaj kunsidis la reprezentantoj de naciaj societoj kaj de UEA por ellabori definitivan interkonsenton. En multaj longaj kunvenoj okazis la malfaciaj kaj penplenaj intertraktoj, sed fine, dum la ferma kunsido de la kongreso, la reprezentantoj povis solene subskribi protokolon, kiel resumon de la faritaj decidoj, kiu ricevis la nomon de »Interkonsento de Kolonjo«.

Ĝia esenca enhavo estas ia jena: UEA estas la tutmonda organizajo de la E-a movado. Al ĝi la naciaj societoj povas aligi siajn membrojn kolektive por malalta kotizo de duona svisa franko. Flanke de tiu »simpla« membreco, la naciaj societoj akcelos la aliĝon de »aktivaj« membroj de UEA laŭ la kondiĉoj de la ĝisnunaj ordinaraj membroj de UEA. La gvidado de la nova UEA estos en la manoj de Int. Komitato, konsistanta el a, membroj, elektotaj de la naciaj societoj, aligintaj siajn membrojn; b, membroj elektotaj de la delegitoj en aliaj landoj; c, membroj elektotaj de la nomitaj du kategorioj, ĝis friono de ilia propra nombr. Centra Estraro, elektota de la komitato, funkcias kiel administra estraro. Dum kongresoj okazos kunsidoj de la »Konsilantaro de la E-movado«, por aŭskulti raportojn ktp. Ĝi konsistos el la komitatanoj, la ĉefdelegitoj, la honoraj membroj, la dumvivaj membroj ktp.

Ŝajnis, ke la Kolonja Interkonsento malfermos la vojon al pli trunkvila estonteco en la movado, sed la faktoj ne realigis tiun esperon. UEA adaptis sian statuton al la nova situacio kaj la estraro preparis skriban voĉdonon por la elekto de la komitatanoj de la kategorio c, kaj de la Centra Estraro. Sed denove venis opozicio, ĉefe de la franca nacia societo, kiu postulis la ripeton de la voĉdonado en la UK de Stockholm 1934 anstataŭ la skribaj elektoj. Polemikoj en cirkuleroj kaj gazetoj anoncis novajn malfacilaĵojn dum la estonta kongreso.

En aŭg. 1934 pli ol 2000 partoprenantoj en la UK de Stockholm dum krizaj ekonomiaj cirkonstancoj

denove donis belan pruvon pri la kreskanta forto de la E-a movado. Sed en la komitataj kunvenoj ree naskiĝis la internaj konfliktoj. Okazis la elektoj por la alelektotaj membroj de la komitato, kiu donis tute alian rezulton ol la antaŭaj skribaj voĉdonoj. Karsch, la ĝisnuna vicprez. de UEA, d-ro Privat, la red. de la gazeto „E” kaj Andreo Cseh, ĉiuj de longa tempo anoj de la komitato, ricevis la plej malmultajn voĉojn kaj pro tio ne estis reelektataj en la komitato. La prez. de UEA, Stettler, trovis en tio kaŭzon por demeti la prezidantecon. Lin sekvis Karsch kaj Hans Jakob, direktoro de UEA. En la kongresa kunsido, kie tiuj decidoj estis konigataj, ili kompreneble vekis grandan konsterniĝon. Speciala kunveno, kunvokita por klarigi kaj diskuti la situacion, vidis grandan tumulton, aŭdis ekscititajn kaj eĉ ofendajn vortojn. Nur kun granda peno oni sukcesis trankviligi la animojn kaj revoki la deziron al paca kunlaboro.

Dume la nova estraro de UEA, sub prezido de generalo Bastien, staras antaŭ grandaj malfacilaĵoj, kaŭzataj de la malbonaj financaj cirkonstancoj de UEA.

(Prenita el la verko »Historio kaj organizo de la E-a movado« kaj el artikolo en »La Praktiko«, okt. 1934.)

J. R. G. ISBRÜCKER.

Notoj de C. C. Goldsmith pri la historio 1932—33. (1) Oni tute elisis la fakton ke la nova propono estis necesa, ĉar UEA reduktis sian subvencion al ICK de 2500 ĝis 500 svisaj frankoj, kaj sekve la malnova organizo ne povis vivi. — (2) Ne la franca societo faris la novan proponon en 1932, sed la brita, franca, germana, kaj itala societoj kune faris ĝin. — (3) La Komisiono esperis ke UEA estus la nova int. organizo, kaj tiucele oni proponis ke ĝi prenu du el la sidoj en la Komisiono, sed ĝi rifuzis. Krome, tuj post la kunveno de la Komisiono, laŭ peto de ĝia membraro, ni proponis ke UEA estu la titolo de la nova organizo, la UEA-oficejo estu ĝia centro, kaj ke se eble, Stettler estu la unua prezidanto. Merchant eĉ konsentis ekŝiĝi

por tion permesi. UEA tute ne respondis al la propono, kaj nur post tio oni starigis UFE-n. (4) Fakto estas ke en la unua monato 11 societoj aliĝis al UFE, inkluzive Francujo, Italujo, Svedujo, Britujo, kiuj estas inter la plej gravaj societoj. — (5) La kunveno en Genève en majo 1933 estis aranĝita, laŭ propono de BEA, nur por interrilati kun UEA por vidi ĉu lastmomente oni povus trovi interkonsenton. UEA rifuzis partopreni, kaj nur estis pro la persona interveno de Schoofs, UEA Cef-delegito en Belgujo, ke Stettler konsentis renkonti la aliajn ĉeestantojn. — (6) La interkonsento de Kolonjo povus esti atingita du jarojn pli frue se UEA nur estus konsentinta diskuti la aferon, ĉar ĝi estas preskaŭ laŭ la propono farita de BEA en majo 1931. — (7) Oni tute elisis la fakton ke oni postulis la ripeton de la voĉdonado en Stockholm pro la fakto ke la skriba voĉdonado estis erare farita, ĉar oni permesis en tiu ke personoj voĉdonu por si mem.

Orientaj fabeloj. De Doroŝevič, el la rusa trad. Ho hlov. 1924, 66 p. »Humoraj, trafaj satiroj, vestitaj per la vualoj de orienta kostumo. Tiel ili povis vipi la rusan ceran reĝimon, mokante la nekompreneman cenzuron. E-igo tiom taŭga, kiom la originala teksto estas sprita.« (G. S. „E”, 1924, p: 188.)

Oriento. Kvin n-roj de „Ilustrita Biblioteko”, tradukoj kaj originalaĵoj. 1928. »Bona elekto por iom malkovri al ni flankojn de la orienta vivo aŭ animo.« (G. S. „E”, 1928, p: 106.)

Oriento. Tute unika revuo, kiu celis konatigi la historion, etnografion, literaturon ktp. de la orientaj landoj. Red. Serišev en Harbin. La 1-a n-ro eliris en jul. 1925 kun 114 p. kaj 33 bildoj, la 2-a kaj lasta enhavis 96 p. kaj 28 bildojn, 26×18. P. TARNOW.

Originala Verkaro de L. L. Zamenhof. Kolektita kaj ordigita de J. Dietherle, 1929. 605 p. »Ĝi estas rimarkinda kolekto de antaŭparoloj, artikoloj, traktajoj, paroladoj, leteroj kaj poemoj. Grandparte la enhavo de la libro venis el fontoj malfacile konsulteblaj, kaj multo neniam antaŭe estis presita. La volumo jetas lumon

sur multajn fazojn de la nekonata historio de la komencaj tagoj de nia movado. Ĝi staras unika — la plej granda verko el la tuta originala E-a literaturo. (British E-ist, okt. 1929.) — »D-ro D. ne simple kompilis la kolosan materialon, sed ordigis ĉion en tre laŭdinda maniero faciliganta la superrigardon. Multnombraj steletoj kaj piednotoj klarigas kaj helpas.« (Butin, HDE, 1929, n-ro 43.)

Örn August Kristian, svedo, policisto en Gevle. Nask. 29 okt. 1881 en Skyttorp. Kunfondinto de EG Gevle, 1907. Estis estrarano de SEF. Ano de UEA de ĝia fondo. Fondinto de la unua EG en Enköping, 1919. Agado en Int. E-ista Polic-Asocio. Kursgvidado kaj prop.

Orthal (ortal) Heinrich, germano, d-ro jura, advokato, »Justizrat«. Nask. 27 jun. 1878 en Kempten. E-isto de 1908. Kiam la antaŭe E-a »Weltsprachenverein« en Nürnberg sub gvido de ĉefinstruisto Schmidt (amiko de Z) transiris al Ido, li fondis tie komence de 1909 lokan grupon de GEA, kiu ekzistas ankoraŭ nun. Li faris en la sekvaj jaroj pli ol 100 prop. paroladojn en tuta Bavarujo, estis kelkan tempon prez. de la Bavara E Ligo. De 6 jaroj instruas E-n en la malliberejo en N.

Osida Tokurō, japano, kuracisto. Nask. 24 marto 1875. En 1919 fondinte Nippon E-Sya, eldonis multajn E-lernolibrojn kaj vortarojn. Poste importis E librojn el Eŭropo.

Osmond Emma L., anglino. Nask. 7 okt. 1868 en London. E-isto de 1917. Instruis E-n 1918—29. Multe korespondis, verkis ĉ. 250 artikolojn en diversaj E kaj A gazetoj. Tradukis al E el multaj lingvoj.

Plej mi' da kaj kompata larmo,
Pri homa sorto malfacila.
En Old Vic, la Shakespeare-azila,
Inter la tragedia svarmo,
Sin ne altiras murd-alarma,
Sed saĝa fraz' virinsubtila . . .

(Kalocsay: Rimportretoj.)

Ossaka Kenji, japano, mekanika inĝeniero, sekiestro de ŝtata Fervojo, Nagoya. Nask. 23 jun. 1888 en Tôkyô-si en familio de militisto sed arda

idealisto-pacamanto. Lernis en kadeta lernejo 1901—07 sed 1907 eksciĝis el milita servo pro malsano, vizitis Imperian Universitaton kaj fariĝis inĝeniero, 1916. E-n lernis en 1905 unue per »Sekaigo« de Futabatei kaj poste en kurso de »Nippon ES« de Misao Kato, kaj post foriro de Kato sindone laboris por E en Yokosuka. 1916 venis al Tôkyô kaj dediĉis sin al centra administrado de JEA, kaj kiam JEA perdis funkcion, en 1919 kun aliaj fondis novan movadcentron JEI, kiu bone kreskis dank' al supermezure energia klopodado de li kaj junaj studentoj varbitaj de li. Historio de J E-movado estas kvazaŭ sinonimo al E-ista agado de Ossaka. Li dediĉis ĉiujn liberajn horojn al E-aj laboroj. Dir. de JEI. Red. »Jokoska E-isto«, 1907—15, »Orienta Stelo«, 1911-15, »Japana E-isto«, 1916-19, LRO, 1920—25. 1925—27 vojaĝis en Usono kaj Eŭropo. Unuaklasa E-gramatikisto. Liaj prilingvaj artikoloj mirinde multe verkitaĵoj en diversaj gazetoj, ĉefe en LRO, estas tre ŝataj de J-aj E-istoj kaj donas gravan servon al eduko de kapablaj posteuloj, kune kun liaj verkoj. Verkis: »Elementaj Lecionoj de la lingvo E« (anonime), 1914 (Taihoku); »Ekzercolibro de E«, 1920; »Klaslibro de E«, 1920; »E-aj Partikuloj«, 1921; »E-a Prozodio«, 1922; »Memlernanto de E« (kun Akita), 1923; »Plena Kursolibro por J«, 1924; »E, kompleta kurso por J«, 1927 (11-a eldono en 1929); plej ŝata vasta lernolibro en J-ujo. Trad. »Perloj el la Oriento«, 1921 (tradukoj el J-aj kaj ĉinaj klasikaj verkoj); »Vortoj de Konfucio«, 1923; »Fabloj de Ezopo«, 1932.

KUWAHARA.

Ostan'evič Kazimir Osipovič, ruso. Nask. en 1859, mortis en 1911 en Petrograd. Pioniro de E. En 1899—1902 estis prez. de ES »Espero« en P. Prop-is multe per la gazetaro, oferis multe da mono por E, posedis riĉan bibliotekon.

Ostrovskij Ilja, ruso, kuracisto en Jalta (Krimco). Nask. en 1855. E-isto de 1892. Li multe prop-is E-n kaj en 1895 sukcesis ricevi permeson de la registaro por eldoni la unuan E-rusan gazeton, E'. L. K. 1905—10.

Ostwald Wilhelm, germano, mond-fama scienculo. 1859—1932. Kelkan tempon amiko de E, poste fariĝis ĉefa subtenanto, eĉ subvencianto de Ido. En 1916 ellaboris universalan germanan lingvon »Weltdeutsch«. En 1926 skribis pri la bezono ellabori novan int. lingvon. (Drezen, Hist. de Mondlingvo, p: 144.)

Osugi Ei, aŭ Sakae, japano, verk-isto. Nask. 17 majo 1885 en Maru-game-si, mortis 16 sept. 1923 en To-kyo. Dumlonge oni konsideris lin kiel tipon de »socialisto« (malamiko

de J-a Imperio), sed verdire li estis anarkiisto. Ĉe tertremego en Tokyo 1923, ĝendarmoj buĉis lin kaj lian edzinon, kaj sufokis lian kuzon, »por la bono de la ŝtato«. Estis pioniro de E, fondis E-lernejon en sept. 1906, kie Chif estis lernanto. Trad. »Momotaro«, plej populara J-fabelo.

Oxford. Urbo en Anglujo; 57,000 loĝantoj. — 22-a UK 2—9 aŭg. 1930; 1200 kongresanoj el 30 landoj. Granda sukceso de la Cseh-metodo. Ĉef-temoj: E en la radio kaj komerco.

P, Q

Pacifismo. P. estas aro de la ideoj, kiuj »anstataŭigas militon per juĝo por la solvo de la malkonsentoj internaciaj.«

Estas nature, ke E de komenco trovis multajn rilatojn kun P. Precipe, ĉar Z mem estis ekstrema pacifisto. Ankaŭ en preskaŭ ĉiuj naciaj prop. broŝuroj de la unuaj adeptoj sin trovas pacifistaj rimarkoj. Sed Gaston Moch estis la unua, kiu sisteme uzis E-n por servi al P.

6 apr. 1905 en Paris li preparis fondiĝon de Int. Societo E-ista por la Paco en ĉeesto de 16 personoj, kaj oni decidis fondi ankaŭ revuon monatan »Espero Pacifista«. Dum la 1-a UK en Boulogne-sur-Mer, 1905, Moch aranĝis kunvenon de la societo; ĉeestis 39 membroj el 12 nacioj. La int. kongresoj de E, precipe la unua, estis manifestacioj pacifistaj. Ankaŭ la apudkongresaj paroladoj de urbestroj de Folkestone, Dover, kaj Calais estis E-istaj pacifistaj deklaraĵoj.

Dume la »Espero Pacifista« aperis. La unua n-ro, jul. 1905, havis 64 paĝojn, — bele presitajn, riĉenhavaĵajn. Ĝis fino de aŭg. la revuo havis 124 abonantojn. 21 sept. 1905 okazis la unua ĝenerala kongreso de la societo dum la 14-a Universala Kongreso de la Paco en Luzern. Moch fariĝis prez., Schneeberger sekr., Z honora prez. La samurba Kongreso de Paco sin okupis ankaŭ pri E.

Jam en 1889 la 1-a Kongreso de Paco (Paris) esprimis principan deziron por la akcepto de »interkonsentita lingvo« kaj elektis studentan komitaton. Ĉar ĝi ne donis vivsignon,

la 6-a Kongreso en Budapest, 1896, elektis novan. La 7-a Kongreso en Hamburg, 1897, sin okupis pri du raporto; la unua pledis por la latina lingvo, la dua raporto (de Moch) aprobata de la plimulto de la komitato, laŭdegis E-n, sed oni trovis, ke la demando ankoraŭ ne estas matura ĉe la pacifistoj kaj tial oni nur rekomendis komparan studon inter E kaj Latino. En Luzern, 1905, Moch proponis, ke la kongreso konsilu al la pacaj societoj, interkorespondi per E, ke la jarlibro montru la societojn, kapablajn korespondi per E, ktp., sed oni prokrastis la decidon.

En 1906 la Societo E por Paco jam havis 295 membrojn el 22 landoj. Kun grandaj oferoj ĝi eldonis sep verkojn de »Libraro Pacifisma«, jarlibron ktp.

Ankaŭ dum la dua UK en Genève, 1906, kiel dum la sekvantaj jaroj Moch povis konstati, ke estis pli da pacifistoj inter la E-istoj ol E-istoj inter la pacifistoj. Notinde estas la telegramo de Nobel-premiita E-isto A. H. Fried, kiu kiel ĵurnalisto partoprenis la pac-konferencon en Haag kaj sendis al la UK en Cambridge la jenan tekston: »El la falsa Pac-Konferenco mi salutas la veran Pac-Konferencon«. La 16-a packongreso en München fine alportis sukceson de E. La kongreso esprimis la deziron, ke E estu instruata en la lernejoj kiel int. helpa lingvo kaj komisiis la Int. Oficejon de Paco, konigi tiun deziron al la registaroj. Krom tio la kongreso decidis,

ke ekde la proksima kunsidaro E povas esti uzata en kunsidoj.

Estis por longa tempo la lasta triumfo de E-pacifista movado. La gazeto post kvarjara daŭro ne plu aperis, la societo mortis. Kaŭzoj estis, ke post 1908 la tuta mondo fariĝis militema, ne plu kredis al ebleco de pacifista solvo de int. konfliktoj. La unuaj E-istoj estis preskaŭ ĉiuj pacifistoj. Nun aperis en naciaj prop. gazetoj eĉ preskaŭ ŝovinistaj artikoloj. Ankaŭ la lingvaj disputoj en 1908/9 malutilis al la afero, eĉ Moch forlasis E-n, kaj mem la batalo por la plej taŭga organiza formo absorbis la fortojn de la E-istoj.

Z mem daŭrigis sian pacifistan agadon, publikigis sian »Deklaracion pri Homaranismo«. Por vivi al la pacifistaj ideoj de tiu ĉi deklaracio li eĉ formetis sian oficialan rolon en la aferoj de E.

Ke dum la mondmilito la armiloj de la spirito silentadis, estas kompreneble. UEA tiam uzis E-n por tre dankindaj homamaj celoj, helpo al malfeliĉaj viktimoj, pero de korespondadoj, ktp., sed agado en senco pacifista estis ne nur vana, sed eĉ danĝera. Eĉ puran lingvan propagandon ŝovinistoj malhelpis per kalendaro de »defetismo«. La mondmilito ne nur sufokis ĉian pacifistan propagandon, sed la registaroj, kiuj ĝis nun ne ŝatis kaj tial ne subtenis E-n, nun ekuzis ĝin, por »informi« la neŭtralan eksterlandon. Precipe Germanujo tiel agis.

Sed tuj post la milito sin montris, ke la E-istoj kiel unuaj sin retrovis en pacifista spirito. Iliaj kongresoj (Haag kaj Praha) estis la unuaj, en kiuj la »malamikaj« nacioj kune kunlaboris. Estis fondita en 1923 »Universala E Pacifista Ligo« (unua prez. Julia Isbrücker, la nuna Einar Dahl). Dum la antaŭkongreso en Wien, 31 jul. 1929, la Ligo aranĝis manifestacion en la granda salono de Kobenzl, kiun partoprenis 400 kongresanoj. Oni decidis ĉiujare daŭrigi dum la UK tiujn manifestaciojn, sed tio restis nur decido, kaj grava E-pacifista movado momente ne ekzistas; decidoj de diversaj societoj kaj kongresoj, artikoloj kaj broŝuroj ne

multe ŝanĝas tiun ĉi situacion. Nur la »Konferenco por Paco en Praha«, 1927, estis iom grava vivsigno de la ideo. Ankaŭ ĝi pruvis, ke la ideo inter E-istoj vivas kaj okazze reaktivigis. Kaj signo de evoluo: ankaŭ inter la E-istoj oni nun pli bone komprenas, ke la pacifista problemo estas nur parte lingva problemo, sed ĉefe problemo rasa kaj ekonomia.

O. SIMON.

Packness (paknes) Martin, dano, eldonisto. Nask. 3 febr. 1839 en Vejle, mortis 24 majo 1914 en V. Multe vojaĝis, restis kelkan tempon en Kaplando. En sia naskiĝurbo faris viglan verkadon kaj eldonadon de E-literaturo kaj 21 jan. 1909 fondis E-klubon.

Paco-Libereco. Int. organizo lab. E-ista (poste nomita Liberiga Stelo) fondita en 1906. (v. Laborista movado.) BRUIN.

Padfield (padfild) Wilfrid Walwyn, anglo, ing. Nask. 15 jul. 1878. Kelkajn jarojn LK. Fondis ES en Ipswich, 1905. Trad.: »Por Arbitracio« de Carnegie. Verkis artikolojn kaj lingvajn notojn por »Scienca Revuo«, »Socia Revuo« k. a.

Page (pejĝ) William Main, brito, sollicitoro en la supera kortumo de Skotlando, vickonsulo de Ĉeĥoslovakujo en orienta Skotlando. Nask. 8 okt. 1869 en London. E-isto de 1905. Sekr. de Edinburgh ES 1906—14, prez. 1914—15, 1920—21. Red. de »E Monthly«, 1914—19 kaj de »The British E-ist« 1920. Aŭtoro de »Pitman's Commercial E«, 1919. Prez. de Skota EF, 1927. Prez. de UK en Edinburgh. Konsilanto de ICK, 1923—26, vicprez. de BEA. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Paĝoj el la Flandra Literaturo. Kolektitaj kaj tradukitaj de Seynaeve kaj Melckebeke. 1904, 136 p.

Pähn (pehn) Elisabet, estonano, eksinstruistino, Ĉseh-instr. gvidinta multajn kursojn en Estonujo, Svedlando, Danujo, Francujo, Nederlando, Hispanujo.

Pais (pajŝ) Alcebiades, brazilano, d-ro, prof. de angla lingvo kaj dir. de gimnazio en Sergipano. Mortis 20 jul. 1927. Fond. kaj unua prez. de

EK de Aracaju. Pere de lia klopodado la ŝtata registaro de Sergipe dekretis leĝon favoran al E. Dum lia vivo la E-movado estis tre vigla en tiu ŝtato.

Palaco de Dangero. Romano de Mabel Wagnalls, trad. el la angla Payson. 1926, 206 p. Bonkvalita, pordistra rakonto pri Madame Pompadour, reĝa favoratino.

Palestino. Unua ES estas fondita en Jerusale'm, 1908, de d-ro E. Schmitz, dir. de germana hospitalo, la dua en 1914 ĉe la tombo de Jesuo, de pastro Gabriel. En Betlehem prop-is en 1914 pastro Marius Rosi. En 1924 venis el Ameriko al Jerusale'm Amiel, kiu kun Havkin, jam kelkajn jarojn loĝinta tie, laboris per gazetartikoloj, paroladoj, kursoj. De kelkaj jaroj Pinhas Laĥovicki, arkitekto, prenis la movadon en siajn manojn, klopodas akiri subtenon de oficialaj faktoroj, aranĝas kursojn; liaj kunlaborantoj: f-ino Rotenberg kaj Benjamin. Unua E-ler-nolibro por hebreoj aperis en 1888, tiu por araboj en 1907. EG kaj UEA-del, en Jerusale'm kaj Telaviv. En 1924 en Telaviv aperis la gazeto »Hebrea E-isto«. P. LAĤOVICKI.

Pa'lieter. De Timmermans, el la flandra trad. Jan van Schoor, 1933, 192 p. »Ĝia fabelomaterialo estas minimuma. Sukoriĉa lingvo kaj realista fantazio. La stilo kaj lingvo de la traduko estas tre bonaj.« (Totsche, »Bibl. Gazeto«, 1933, p: 43.)

Palsberg Martin Petersen, dano, fervojista oficisto. Nask. 3 marto 1892 en Odense. E-isto de 1917, prez. de la EG en Aarhus de 1929. Red. »Dansk E Blad« en 1928, vicprez. de CDEL de 1928. Publikaj paroladoj, kursoj, gazetartikoloj.

Paneŭropo. Movado, kiu celas unuigon de ŝtatoj de Eŭropo kiel ŝtatligo kaj doganunuigo por la intereso de la eŭropaj paco, libereco kaj ekonomio. La ĉefa iniciatinto de la movado estas grafo Richard Coudenhove-Kalergi, kiu en 1923 eldonis sian unuan broŝuron pri P. La P-movado volas atingi sian celon »per kreo de nova publika opinio, per konvinkigo kaj entuziasmigo de l' eŭropaj gvidantoj kaj popoloj por la eŭropa ideo;

per amasmovado, kiu kreskante instigos la partiojn, organizojn kaj registarojn en senco de eŭropa unuigo.« La int. organizo estas: P-Unio, (en Wien), kiu en 1926 aranĝis sian unuan kongreson. P-Unio havas sekciojn en multaj landoj. La programo de P. diras pri la multlingveco de Eŭropo: »Svisujo donas la plej vivan pruvon, ke anoj de tri plej grandaj nacioj de l' eŭropa kontinento povas kune vivi pace, libere kaj egalrajte kiel politika-ekonomia komuneco, ke do la multlingveco ne estas nevenkebla malhelpo por P.« Laŭ Coudenhove-Kalergi E-n oni intencos nur tiam akcepti'el oficialan'ingvon de P., se amasoj postulos tion. (El parolado en Budapeŝt, 6 ma'o 1930). Inter la E-istoj P. havas tre multajn adeptojn. Plej fervora batalanto por P. estis d-ro Edmund Sós, kiu faris por la ideo vastan propagandon, aperigis multajn artikolojn precipe en HDE. Li fondis E-Sekcion de la P-Unio, tradukis E-en la P manifeston kaj eldonigis la 16 paĝan broŝuron »Kion volas P-Unio?« en ĉ. 10.000 e-roj. Dum la UK en Budapeŝt, Oxford kaj Kraków (1929—31) okazis fakkunveno, el kiuj tiu en Budapeŝt estis tre sukcesa manifestacio, ĉestis preskaŭ 300 personoj; aranĝinto estis L. Kökény. Estas notindaj ankoraŭ; memorando de la »E-anara Fajro« en Barcelona (okt. 1930) al la hispana ministro por eksteraj aferoj por adopto de E ĉe starigo de la Eŭropa Konfederacio, kelkaj artikoloj de G. Waringhien, kaj kiel pionira verkaĵo la broŝuro de V. Zielinski »Eŭropo unuigita« en E kaj franca lingvoj, 1921, Konstantinopolo. (Komp. U S E.)

Paolet A. en St. Vito al Tagliamento fondis sian eldonejon jam en 1913. Dum la milito la presejo estis plene detruata kaj multaj eldonajoj malaperis. Paolet eldonis de 1913 ĝis 1929, la gazeton Itala E-Revuo, post la milito eldonis multajn lernolibrojn, vortarojn por italoj kaj kvanton da literaturaj libroj, inter ili la Historio de Kristo de Papini. La 17 verkoj de ĝi eldonitaj valoras ĉ. 27.— svfr.

Paragvajo, Suda Ameriko. Mankas informoj, kiuj kaj kiam estis tie pioniroj de E. En 1927 estas fondita E-

Ligo, kiun estris Miguel Chera, Antonio B. Sole, Jorge Ritter kaj Nestor R. Manzor, tamen la Dietterle-statistiko en 1928 trovis E-istojn nur en Asuncion. En 1933 ne estis UEA-delo en P.

I. SIRJAEV.

Parencrimo. v. Rimo.

Paris. Ĉefurbo de Francujo; 2.891.020 loĝantoj. (Granda—P. 5.103.000 l.) La Biblioteko de la Komerca Cambro, 16 rue de Châteaubriand, enhavas la E-bibliotekon de la estinta Centra Oficejo. Antaŭmilite P. estis kvazaŭ la centro de la E-ista agado, kie agadis Bourlet, Cart, Sebert k. a., aperis La Revuo kaj Lingvo Int., funkciis la Centra Oficejo. — La 10-a UK estus devinta okazi en P., de 2 aŭg. 1914, sed pro la militeksplodo ĝi ne okazis; aliĝis 3739 anoj el 50 landoj. — 24-a UK 30 jul. — 6 aŭg. 1932; 1618 kongresanoj el 36 landoj; nuligo de la Helsinki-kontrakto. — Int. E katolikaj kongresoj, la 1-a en 1910 (fondo de IKUE), la 10-a en 1925 (la unua E-a prediko en la »Notre Dame«).

Parizaj paroladoj de Abdul Baha. Trad. Lidja Zamenhof, 1932, 103 p. «Ili pli sisteme komentas la 11 ĉefregulojn de la instruo de Baha' u'llah. Ne bezone akcenti pri la klara stilo de l' traduko.» (G. S. 'E', 1931, p: 166.)

Parkurbo Esperanto. Plano de E-a urbo, kiu celis esti la centro de la tuta E-a movado. En 1912 estis fondita aparta ligo por efektiviĝi la urbon je 13 km. de München. Oni faris grandan loterion, kolektis monon ankaŭ de E-istoj. Fine la mono pereis, la plano fiaskis.

Parnasa Gvidlibro aŭ Kiel fariĝi Poeto. Aŭtoroj: Kaloecsaj kaj Waringhien. 1932, 176 p. Enhavo: Skizo de E-a Metriko; Arto Poetika; E-a Rimaro kun ĉiuj vortoj de la Plena Vortaro, sen la tro teknikaj, kun 600 neologismaj vortoj kaj 500 propraj vortoj; Poezia Fakvortaro.

Paroladvojaĝoj. La unuaj veraj paroladvojaĝoj per E okazis en la antaŭmilitaj jaroj. La plej notindaj estis tiuj de I. H. Krestanov, A. Pitlik, E. Privat kaj Parrish. La lastnoma ricevis komision de la Komerca Cambro en Los Angeles travojaĝi Eŭropon kaj diskonigi ĉie per E-paroladoj kaj

lumbildoj la belajojn de Usono. Ankaŭ la plimulto de la paroladvojaĝoj post la milito, (okazintaj ĉefe post 1930), havis similajn celojn: la diskonigon de la koncerna lando. La plej gravaj estis la ripetitaj vojaĝoj de H. Steiner en pluraj landoj por Aŭstrujo; por la sama lando faris propagandon R. Frey kaj R. Ĉech. Pri la najbara Hungarujo faris vojaĝojn kun paroladoj d-ro J. Lukács, kaj d-ro S. Puskás, J. Baghy, d-ro F. Szilágyi kaj T. Czitrom. Por Rumanujo faris similajn servojn T. Morariu. Pro la ekzotikeco de la temo ĝuis apartan popularecon la prelegoj de la hindu L. Sinha, de la negro K. Ajayi, kaj de la javano M. Raden. La plej grava vojaĝo per kaj por E estis tiu de J. Scherer, entreprenita per helpo de ICK en la tuta mondo. Kulturaln celon: propagandon por la E-a libro havis la paroladvojaĝoj de V. Bleier, ĉefe en Nederlando. Apartan kategorion formas la t. n. mondvojaĝantoj, inter kiuj troviĝas ankaŭ almozpetantoj kaj aliaj malfeliĉuloj pro la krizaj tempoj. Detalojn v. en la biografioj de la nomitaj personoj.

Parolanta filmo. v. Sonfilmo.

Parrish (pariŝ), Donald Evans, usonano, fabrikisto. Nask. 20 dec. 1889 en Milford (Iowa). E-isto de 1908. Reprezentante Komercan Cambron de Los Angeles vojaĝis en 25 diversaj landoj, 1911—12, reklamante tiun urbon per E-paroladoj. Organizinto de UK en San Francisco, 1915. Nacia sekr. de UEA de 1929.

Parvus Piscis, ps. de L. Halka (v.)

Pasivaj participoj. -ata signifas agon daŭran, do ankoraŭ nefinitan; -ita signifas agon ne plu daŭran, do pretan aŭ finiĝintan; -ota signifas agon intencatan. Ekz: letero skribata: letero, kiun oni ankoraŭ skribas, ne finis; letero skribita: letero, kiun oni jam skribis, letero preta; letero skribota: letero, kiun oni intencas skribi.

Kiel Waringhien montris, la verbojn oni povas dividi en tri grupojn:

1. verboj de daŭro kaj rezulto. Ĉe ili -ata signifas daŭran, -ita signifas pretecon de ago. Ekz: domo konstruata: domo, kiun oni konstruas; domo konstruita: domo, kies konstruon oni finis, kiu estas preta.

2. verboj de daŭro, sen posta rezulto. Ĉe ili -ata signifas, ke la ago ĝuste tiam okazas, -ita signifas, ke ĝi jam ĉesis. Ekz: mono havata: mono, kiun oni havas; mono havita: mono, kiun oni havis, sed ne havas plu.

3. Verboj de rezulto, kun momenta daŭro. Ĉe ili -ita signifas, ke la ago okazis kaj estigis certan staton; -ata signifas ripeton, ĉar ago momenta povas daŭri nur per ripetado.

Se la participoj estas ligitaj kun esti, la afero estas la sama.

1. Ĉe verboj de ago kaj rezulto -ata, -ita, aŭ -ota signas, ĉu temas pri daŭro, preteco, aŭ intenco de ago; estas, estis, estos signas, ĉu la daŭro, preteco, aŭ intenco estas nuntempa, pasinta aŭ futura. Ekz:

La domo estas, estis, estos konstruata: okazas, okazis, okazos konstruado.

La domo estas, estis, estos konstruita: la domo estas, estis, estos preta.

La domo estas, estis, estos konstruota: estas, estis, estos intenco pri la konstruo de l' domo.

2. Ĉe verboj de daŭro, ĝuste ĉar temas ĉiam nur pri daŭro, estas uzata ĉiam nur -ata. Esti signas, ĉu la daŭro estas nuntempa, aŭ ĉesis, aŭ sekvos. Ekz:

Li estas, estis, estos konata: oni lin konas, konis, konos.

Por signi antaŭtempecon (pluskvamperfekto), oni uzas la vorton an' a ŭ e. Ekz: Antaŭe li estis amata de ŝi, sed tiam ŝi ne amis lin plu.

3. Ĉe verboj de rezulto -ita signifas, ke momenta ago okazis kaj efektiviĝis rezulton: -ata signas, ke momenta ago ripetiga. La helpverbo signas, ĉu la konstato de tiu rezulto, aŭ la ripetado de la ago estas nuntempa, pasinta, aŭ futura. Ekz:

La ŝlosilo estas, estis, estos perdita: oni konstatas, konstatis, konstatos la perditon de la ŝlosilo.

La popolo estas, estis, estos mortigata: oni mortigadas, mortigadis, mortigados la popolon.

Kiel ni vidas, en la unua okazo estas akcentita la rezulto, en la dua la daŭro (ripeto) de l' ago. Ĉar la ripeton oni signas per -ad, oni povas kontroli ĉe la rezultverboj (kaj ankaŭ

ĉe la verboj de daŭro kaj rezulto) la ĝustecon de l' uzata participo per tio, ke oni transformas la pasivan frazon en aktivan kaj al la verbo oni ĝluas la sufikson -ad. Se tio ne donas kontraŭencon, oni uzu -ata, se jes, oni uzu -ita. Ekz: »La letero estis skribita jam hieraŭ« estas ĝusta, ĉar »skribadis« aligus la sencon, signante nur agon, ne pretecon. »La domo estis konstruita dum du monatoj« estas malĝusta, ĉar »konstruadis« ĉi tie taŭgas, do oni devas meti »konstruata«. »La ŝlosilo estis perdita« ne taŭgas, ĉar oni ne perdadis, sed simple perdis la ŝlosilon, do oni devas meti »perdita«. »Mia tempo estis perdita per bagatelaj aferoj« taŭgas, ĉar mi perdadis mian tempon.

Sola escepto estas, kiam la supra kontrolo ne estas farebla; nome kiam oni parolas ĝuste kaj akcente pri tiu momento, en kiu la momenta ago okazis. Sed tiaokaze oni ĉiam trovas en la frazo la esprimojn »ĝuste tiam« aŭ »en la momento«, aŭ aliajn similajn vortojn, kiuj signas daŭron tiel mallongan, kian bezonas la efektiviĝo de l' respektiva momenta ago.

Literaturo: Kalocsay: Lingvo, Stilo, Formo, 1931. Lingva Kritiko (HDE), 1933. Artikoloj de T. Jung, Waringhien, Engholm, Padfield, Correio Porto Neto, Kalocsay.

KALOCSAY.

Patai Samu, hungaro, d-ro, kuracisto, »registara ĉefkonsilanto«. Nask. en 1850. Partoprenas la movadon de 1912, estis vicprez. de HES, nun estas ĝia hon. prez. Paroladoj por E. (l. H. Heroldo, 1930, n-roj 1. kaj 7.)

Patroj kaj Filoj. De Turgenjev, el la rusa trad. Kabe, 1909, 165 p. »Ĝi estas pentraĵo de la vivo mem, kiun oni travivas kune kun la aŭtoro. Vere E-a stilo.« (»La Revuo«, 1910, p: 574.) »Tro rapide tradukita, ĝi nur pale reproduktas la originalon.« (BIL, p: 375.)

Patsuris E. Stavro, greko, juristo. Nask. 1909 en Athen. De 1927 gvidas kursojn en HEA-ejo kaj en gimnazioj. De 1934 ĉefdel. de UEA.

Patzelt (pacelt) Julius, germano, horlogisto kaj fortepiana agordisto. Nask. 9 majo 1857 en Gross-Schönau (Germ.), mortis 17 jan. 1927 en Ober-

grund, (Ĉeĥosl.) Pioniro en Aŭstrio-Hungarujo, vera apostolo en norda Bohemujo. Korespondis kun Z. Fondis multajn grupojn kaj gvidis konstante kursojn. Eldoninto de l' gazeto: »La migranto« kaj de pluraj E-lerniloj. Sur lian tombon GEL stariĝis monumenton.

Paulo Debenham. Romano, originale de Luyken, 1912, 228 p. Censure malpermesita en la cara Ruslando (BIL). »L. vivigas personojn de diversaj landoj. La stilo estas agrabla la intrigo, bone kondukita, malvolviĝas, premante ĉiam la leganton.« (La Revuo, VII-a vol., p: 190.)

Paulo kaj Virginio. De Bernardin de Saint Pierre, el la franca trad. Hodler, 1905, 116 p. »Ĉiuj paĝoj, kiujn ni povis legi, ŝajnas al ni bone tradukitaj kaj pro tio ni opinias, ke ni povas rekomendi tiun ĉi tradukon de verko por tiel diri klasika.« (»L' E-iste«, 1906, p: 38.)

Pavlov Petr Aleksandroviĉ, ruso, estro de meteorologiaj stacioj de ĉina orienta fervojo 1902—30. Nask. okt. 1871 en Rjazana gubernio apud Moskva. E-isto de 1912. UEA-del 1924; faras bonan akcepton al japanaj E-istoj vizitintaj Harbin kaj vekas en ili intereson por mondvojaĝo per E. Verkis du met. raportojn en rusa lingvo kaj E, 1929; kaj E-R vortaron de meteorologio kaj klimatologio, 1934. — (Kuw.)

Payson (pejson) Edward Saxton, usonano, fabrikisto. Nask. 26 sept. 1842 en Groton (Mass.), mortis 22 sept. 1932. Opera kantisto en siaj pli junaj jaroj, fabrikisto de pianoj de 1882, prez. de pianofabrika kompanio de 1906. E-isto de 1910, prez. de EANA 1918—21, poste honora prez. Tradukinto de »La Akrobato de Nia Sinjorino«; »Blanche« de Schubin; »La Rozujo Ciumuljara«, »Misère«, »La Palaco de Dangero«, ĉiuj tri de Wagnalls; »Thais« de France; »Mimi« de Giesy; »La Karto Mistera« de Moffet; »Luno de Izrael« de Haggard; kaj aliaj. Originale verkis »Juneco kaj Amo« kiam 87-jara.

Pázmány (pázmánj) Zoltán, d-ro, hungaro, univ. prof. de la roma juro en Pécs. Nask. 26 marto 1869 en Esztergom-Szentgyörgymező. Prelegis,

verkis kelkajn artikolojn pri kaj en E, estis prez. de HES dum 1925—28. Lia prop. broŝuro aperis en 1911.

Peckover (pekovert) Priscilla Hannah, anglino. Nask. 27 okt. 1833 en Wisbech (Cambs.), mortis 8 sept. 1931 en W. Kvakerino. Ĝismorte subtenis multajn bonfarajn movadojn. E-istiĝis en 1906. Grandparte al la financa helpo de ŝi kaj de ŝia fratino Algerina ni ŝuldas la eldonon de la Biblio en E kaj de diversaj Bibliaj kaj aliaj E-eldonaĵoj.

PED: Pola E-Delegitaro, la gvida institucio de E en Polujo.

Pedagogia valoro de E. La E-a gramatiko havas tri ĉefajn ecojn: simplon, mallongon kaj logikecon:

Pro la logikeco ĝi estas facile lernebla ankaŭ por malpli talentaj infanoj, kiuj multokaze bezonas nur solan sukceson (kaj tion ja donas al ili la studado de E) por ke la ambicio vekigu en ili: tiel ili kapabliĝas venki ankaŭ la malpli facilajn taskojn. Kaj la pli talentaj — ĉiu infano, kaj eĉ plenaĝulo posedas konsiderindan emon je ĝeneraligo — post fino de E-kurso ne povas jam imagi la timigan malfacilon de aliaj fremdlingvoj.

Tamen ne nur simpla, sed ankaŭ mallonga estas la E-a gramatiko. Tiu fakto ne nur plifaciligas sed ankaŭ mallongigas la instruadon. En E fariĝis preskaŭ superfluaĵ ĉiuj »direktaj metodoj por infanoj«. (La bonega Ĉe-metodo ja havas tute alian celon; dum sessemajna instruado de plenaĝuloj oni ja ne intencas akiri pedagogiajn valorojn!)

La strikta logiko de la gramatiko postulas fortan atenton, konsciencajn analizadon de l' gepatra lingvo kaj sintezadon de la tiel ricevitaj rezultoj en E. Nenie tiom forte, kiom en E la infano povas sperti, ke kun fida kono de gramatiko la enlingva konstruado fariĝas facila kunmetado de la frazelementoj — sento kies posedo estas nepra kondiĉo de sukceso pri lingvaj studoj. La mirinda orientiĝopovo en la gepatra lingvo kaj la kutimiĝo al logika pensmaniero estas ankoraŭ menciindaj el la sen nombraj avantaĝoj de tiu eco de l' E-a gramatiko.

La E-a gramatiko ankaŭ kiel tuto havas siajn gravegajn kaj atentindajn valorojn pedagogiajn. La senekzempla, solstara lingvistika pragenio de Z kreis en la strukturo de E la plej mirindan verkon, kies interna forto, nesuperebla belo impresas senpere la koron, kie ĝi — pro manko de pli profundaj antaŭstudoj (kaj tio estas la kazo ĉe infanoj) — devas eviti la menson.

La E-a gramatiko estas feliĉe internacia. Z senmanke rekonis ke la eŭropaj lingvoj havas komunecojn nur konceptrilate. Tiel li plene sukcesis eviti la pseŭdointernaciecon de multaj mondlingvoprojektoj (kaj precipe de Ido), krome donacis al sia verko malpreterindan pedagogian valoron: la infano (kaj ĉefe, se li estas ano de nacio, kies lingvo ne apartenas al Eŭropo) ekkonas la eŭropajn lingvokonceptojn, sen fiksiĝi al formoj ajne ne uzeblaj. Ĉiterene ni havas ankaŭ praktikajn pruvajojn: la rezultojn de la eksperimentoj faritaj en la unuagrada episkopa lernejo de Auckland en la jaroj 1922—24. Oni komencis instrui 76 lernantojn E-e kaj 76 france. Post jaro ankaŭ la instruistaj antaŭe E-e lernantoj komencis la studadon de la franca lingvo. Post paso de nova jaro evidentiĝis ke ili superis en la franca tiujn, kiuj okupiĝis dum du jaroj nur pri ĝi.

La dua pilaŭro de E estas la vortfarado. Ĝi baziĝas sur la principoj de sufiĉo kaj neceso. La sufiĉo postulas ordemon kaj atenton, plue la konsciencan alproprigon de la afiksoj kaj de la eĵoj de kunmeto. Infanoj — kiuj sekve de sia aĝo postulas ankoraŭ komprenemon — volonte faros ĉi tiun malgrandan laborplion por ke ili kapabliĝu je preciza sinesprimado. Kaj la teorio de neceso gravas ankoraŭ pli. Ĝi dekutimigas la infanojn pri pleonasmemo, kiu ja estas tiel ofta malsano inter ili. Lernanto, kiu posedas la vorton »sipestro« (kies sampreciza esprimo postulas en ajna eŭropa lingvo 2—4 vortojn) ne sentos iun ajn entuziasmon spertante tro longajn germanajn terurvortojn. La trakompreno de l' teorio de la vortfarado — kaj tio nepre okazas, se ne alie, en la praktiko — postulas

certain intelekton. Se tia ne ekzistas, ĝi evoluigas ĝin al si. Ĉu dubeble ke ankaŭ tio reprezentas konsiderindan pedagogian valoron?

La vortaro prezentas sian plej bonan flankon en la internacieco. La infano, kiu lernis E-n, ne ridindiĝos dumdebate, intermiksante prareligion kun privilegio. Kaj denove videblas la konstanta avantaĝo: la fakto ke la vortaro enhavas 38—82 %-ojn el la respektivaj eŭropaj lingvoj (statistiko kompilita de kontraŭ-E-isto!) garantias pri tio ke E estas bona elementara lernejo por studentoj de fremdlingvoj.

La reguleco de la E-a vortaro al-kutimigas severan ordemon. En ĝi ne ekzistas »mots Mackenséniques« (Idiom neutral) kaj tio malebligas ĉiun rapsodian saltadon kaj senzorgan aplikadon de ajnaj elfingre suĉitaj »internaciaĵoj«. Do la vortaro havas grandan parton en la intelektevoluiga efiko de instruado de E.

Tamen ni ankoraŭ ne elĉerpis la mencindajn. Ekzistas ecoj, efikoj, kiuj ne estas alkalkuleblaj al tiuj de la tri ĉefaj partoj (gramatiko, vortfarado, vortaro) sed karakterizas la tutan lingvon mem.

La unua estas la stilo. La deviga simpla kaj komprenebla refrapas ankaŭ en la gepatra stilo de la instruato. Ofte okazas, ke lernanto, kies nacilingva stilo estis ŝoke neĝuebla, fininte siajn E-ajn studojn: sian gepatran stilon plibonigis.

Pere de E la infano ekposedas internacian lingvon. Li sentas sin, kvazaŭ la obstinaj baroj reale dissaltus ĉirkaŭ li, li spiras pli libere, eksentas ke li apartenas al la Mondo kaj ricevas mensan horizonton antaŭe neimageble larĝan. Li korespondas: liaj geografiaj, etnografiaj, lingvistikaj, ktp. konoj plinombriĝas kaj profundiga. Por li Francujo ne plu estas rozkolora makulo sur la geografikarto, sed vivanta, vera lando, en kiu vivas samaj homoj, kiel li, kun kiuj li havas senfine multajn komunajn pensojn, sentojn, konceptojn. Kaj tiel li sukcesas atingi pli noblan mondpercepton, la veraj pacifismo kaj interfratigeemo ekregas lian koron, im-

unaj ja je belaj frazoj, sed tiom pli sinceraj kaj profundradikaj.

Kompilita ĉefe laŭ artikolo de

J. MIHALIK.

Pehrsson (persson) Rudolf, svedo, ing., komercisto. Nask. 5 majo 1895 en Uppsala. Estis sekr. (1913—17), poste estrarano de SEF (ĝis 1930). Kunlaboranto, poste sekr. de Eldona Societo E. Fondinto kaj komence red. de »La Espero«.

Pejzaĝoj en Aŭstrio. Eldonis la ministerio por fervojaj aferoj, Wien. 1913, 120 p. Luksa libro pri la antaŭmilita Aŭstrujo kun multaj ilustraĵoj.

Peko de Kain. Novelo originale de Ŝirjaev, 1932, 35 p. La aŭtoro kontraŭstarigas la sorton de militrifuzinto kaj batalinto, glorigas la unuan kaj prezentas per koloraj penikstrekoj la teruron, kiu atingis la duan. (Laŭ L. M. 1932.)

Peltier (peltje) Emile, franco, katolika pastro. Nask. 17 sept. 1870 en Villandry (apud Tours), mortis 17 febr. 1909. Unue prof. de angla lingvo; poste pro malbonfarto, malgraŭ sia spirita valoro, restis dum preskaŭ la tuta vivo pastro de malgrava parofo Sainte-Radegonde (apud Tours). Pioniro de E ĉe la katolikoj. E-iĝis en 1901. Senlace li laboris por konvinki la katolikojn, ke ili uzu tiun armilon por defendi sian religion. Jam en 1903 aperis, sub la nomo de societo »Espero Katolika«, E-lingva aldono al L' Aube, franca revueto. Tiu societo ricevis aprobon de la ĉefepiskopo René François. En okt. 1903 Espero Katolika fariĝis okpaĝa gazeto. En 1905, dum la unua kongreso, Peltier diris la unuan E-istan meson, sed ne povis prediki en E, pro malpermeso de la tiea episkopo. Tamen, ne ĉesiginte sian klopodon, li ricevis dum la dua kongreso, pere de Monsinjoro Giambene, leteron el Romo, esprimantan »Papan Placon«, kaj komunikantan »Lian Apostolan Benon«. Tuj sekvis permeso por prediko, kiu okazis la 2 sept. 1906 en la preĝejo S. François. La granda intereso, kiun havis por E Pio X, estis plej grava kuragiĝo kaj naskis pionirojn por la Katolika E-a movado. Li prizorgis diversajn eldonaĵojn: »Kolekto de Espero Katolika«, nome:

»Katolika preĝaro«; »Imitado de Jesuo-Kristo« (unua libro); broŝuroj de katolika propagando. »Elementa Kurso de E«, 1907. Traduko de Boissaries: »Lando de Mirakloj«, 1908.

L. BASTIEN.

Per Balono al la Poluso. La ekspedicio de André, Strindberg kaj Fraenkel en 1897. Aperis samtempe en 10 lingvoj, inter ili en E, 1930. El la sveda trad. Engholm, kontrolis Nylén. 411 p. 115 bildoj. Verkita sur la bazo de la notajoj de la scienculoj-martiroj, trovitaj 33 jarojn post ilia morto sur la Blanka Insulo en 1930.

Peri Antonio, italo, supera militmarista oficiro, postmilita teknika direktoro. Nask. en Arezzo, mortis 17 majo 1930 en La Spezia. »Ĉiam sprita, senceremonia, lojalega, li devigis al simpatio kaj amemo ĉiujn, kiuj lin iom konis.« Oni nomis lin: »la komandanto.« Dum la itala-turka milito en 1911, sur la kroz-ŝipoj ĉe la Libia bordo, lernis E-n. Lia influa helpo ebligis la starigon kaj rapidan kreskon de la EG en La Spezia, kaj la organizon de publikaj paroladoj kaj kursoj, kiujn li mem gvidis. Estis del. de UEA kaj plenumis diversajn gravajn servojn. Verkis ampleksan radio-vortaron en E (kun Oren-go); granda parto restis en manuskripto. De 1926 estis estrarano de la IEF.

Perloj el la Oriento. Trad. K. Os-saka. 1921, 38 p. Versaj kaj prozaj tradukoj el la japanaj kaj ĉinaj klasikaj verkoj. Bona lingvo.

Perogordo José, hispano, artileria generalo, eksmilitista aviadisto. Prez. de la EG en Madrid. Prop. agado.

Perrenoud (pernu) William, sviso, d-ro de sciencoj, mezlerneja instr. en Cernier. Nask. 30 marto 1898 en Le Locle. Filologo kaj naturscienculo. Laboris en 1919—20 en la Centra Oficejo de UEA en Bern. En 1922 estis ĝen. sekr. de la Ped. Konferenco pri E en Genève. De 1925 kunlaboranto de IALA. Oficiala E-tradukisto ĉe la 3-a Kongreso de Univ. Federacio de Ped. Asocioj en Genève en 1929. Verkoj en manuskripto.

Persujo, Azio. La unuaj pioniroj estis (laŭ UEA-Jarlibro 1928) M. Abesgus, (rusa bankoficisto) en Tehe-

ran, 1901, E. Rebrük en Recht kaj A. Ter Hovhanisians en Tabriz. En 1910 la ĵurnalo »Begar« presis artikolojn pri E. Nur en 1911, kiam Abdul Baha, la ĉefo de la bahaismo, proklamis, ke ĉiu ano de la movado devas lerni E-n, aperis en la lando intereso al la lingvo kaj komenciĝis ĝia propagando. En 1912 en Tabriz oni aranĝis E-kurson kaj ĉiusemajnajn kunvenojn, gazeto »Karadag« en 1913 parolis ofte pri E. En 1913 E-istoj en Tabriz intencis eldoni prop. gazeton sed la registaro ĝustatempe komprenis la »danĝeron« kaj anstataŭ permesis la gazeton la urbestro eldonis cirkuler-anoncon, kiu malpermesis eĉ legadon de »malutilaj« gazetoj. Tiutempe E-istoj jam estis en la urboj Tabriz, Teheran, Rešt, Ĝulfa, Urmia, Mešediser, Koĉan, Ardebil, kaj Sovuĉbulag. En 1914 E-n energie propis en Teheran la bahaano Princo Bahmen Šidani kaj Resser, rusa bankoficisto. Ili laboris dise, longe nenion sciante pri la laboro unu de la alia, nur en 1916, konatiĝinte, ili agadis kune. Šidani tiam havis 10 E-istajn instruistojn en la urbo kaj 100 gelernantojn. De tiam la movado ĉiam altiris novajn batalantojn. En 1925 fondiĝis grupoj en Sultanabad (Vaghinak Sarkisjan kaj Reza Taheri gvidis kursojn) kaj en Tabriz (Ali Akber Nemseĉi). Laŭ la Dietterle-statistiko en 1928 E-istoj estis en 8 lokoj de la lando. Laŭ ICK-raporto en 1930 Darjus-Nemseĉi (Tabriz) »faris eksterordinaran oferon per aperigo de la persa ŝlosilo en 6.000 e-roj.« En 1933 UEA-del. troviĝas en Espahan, Recht, Sultanabad, Tabriz kaj Teheran. E-lerniloj en persa lingvo aperis de Šidani (1915, 16 p., 1923, 112 p.), Tabatadi Seid Shafi (1920, 64 p.) kaj lernolibro trad. de Becker kaj Grosjean-Maupin (1927, 194 p.)

I. ŠIRJAEV.

Peruo, Suda Ameriko. E estis enportita el Francujo en 1901. La unua pioniro kaj fervora prop-isto de E en Suda Ameriko estis d-ro Fr. Villareal (v.), kiu ekde 1901 laboris por E per multaj artikoloj en »Revista de Ciencias«, kiun li redaktis kaj »El Comercio«, la plej malnova perua gazeto. Samjare li verkis kaj eldonis la

unuan lernolibron de E por hispanoj kaj en 1903 fondis en Lima Societon por prop. de E; ekeldonis E-H gazeton »Antaŭen E-istoj!« (longe kaj regule aperintan). La societo estis malfermita solene en ĉeesto de multaj pedagogoj kaj studentoj, kiuj scivole-rigardis modestan E-ekspozicion, (aranĝitan de la »strangulo« profesoro), kiu konsistis el 22 maldikaj verkoj pri kaj en E, 8 jarkolektoj de E-gazetoj, 60 leteroj, 340 poŝtkartoj (en albumo), ricevitaj el 25 landoj. Poste, en 1903, estis aranĝataj kursoj en la urboj Chiclayo, Arequipa kaj Humachuco. En Huaraz oni aranĝis E-kursojn en 1906 en Societo »Evolucion Juvenil«. Daŭrigintoj kaj helpantoj de Villareal estis en 1905 pastro D. Cerna en Jesus kaj Em. Fetzet, direktoro de la nacia kolego en Arequipa. En 1906 laŭ la interveno de la deputitoj Nunez del Areo kaj Malaga Santolatta la parlamento donis subvenciojn al la E-Societo. Samjare oni komencis instrui E-n en la Komerca lernejo de Lima. Dum la plujaj jaroj la E-movado apenaŭ vegetis. En 1928 laŭ la Dietterle-statistiko ekzistis nur tri izolaj E-istoj en Lima. Laŭ raporto de ICK en 1927 fondiĝis denove ES en la lando, sed ĝi »pro trompa interveno de izolita idisto ne povis bone disvolviĝi.« I. ŠIRJAEV.

Per Voĉo Plena. Revoluciaj poemoj de V. Majakovskij, el la rusa trad. Rublov, Nekrasov, Hohlov kaj Sutkovoĵ. 1930, 71 p. »Supermodernaj poeziaĵoj. Mi komprenis ilian sencan nur post kelkfoja tralegado.« (Butin, HDE, 1931, n-ro 5.)

Petaloj. Versaĵoj originalaj de Cz. Kozłowski. 1912, 28 p. »La ĉefa tono: melankolio. La ritmo estas konforma al la enhavo: ne gaje sonanta, sed iom griza, neregule interrompata.« (S. Obr., »Ondo de E«, 1913, p: 118.)

Petiau (petio) Henri, belgo, komerca dir. en Gent. Ĝen. sekr. de BLE, komitato de UEA. Multajn jarojn estis prez. de K. R.

Petit (pöti) Pierre, franco, redaktoro pri ŝipkonstruado. Nask. 18 jul. 1904 en Reims. E-iĝis en 1919. Sekr. de EG en Rosny-sous-Bois (1920-22), de la Federacio de la Pariza Regiono

(1922-24), de SFPE (1923-24), adm. de SFPE (1924-29), helpsekr. (1924-29), konstanta sekr. (de 1929), videl. de SFPE en KR (1932), kaj sekr. de la Plenpova Komitato pri reorganizo de la neŭtrala E-a movado (1932-33). Laboris ĉefe pri la reorganizo de la Federacio de la Pariza Regiono (1921-22), kaj de SFPE (1922-24). Mirinde agema propagandisto per paroladoj ktp., kaj organizanto. Al li SFPE dankas multajn el siaj progresoj dum la dek lastaj jaroj. Publikigis rakonton pri vojaĝo en Italujo (en la »Tribune E-iste«).

Petkov Simeon, bulgaro, advokato, publicisto. Nask. en 1886 en Silistra (nun en Rumanujo), loĝas en Sofia. Ekagis por E jam en 1906. En 1906 red. »Unua Paŝo«, en 1907 »B. E-isto«. Prez. de BEA de 1912 ĝis 1920.

Petrjaevskij P. P., ruso, kapitano. Prop-isto en Saratov en 1894—1903, kiam en la urbo la E-movado preskaŭ tute mortis. La malfacilaĵojn ilustras, ke loka gazeto (»Saratovskij Listok«, 1901) rifuzis enpresi eĉ pagitan anoncon pri E. Malgraŭ tio li varbis E-istojn. En 1904 partoprenis en la japana milito, pri kiu liaj impresoj aperis en »La Revuo« 1908, n-roj 6—18. S.

Petro. Kursa lernolibro por laboristoj. 5-a eld. 1932, 112 p. »Ĝi speciale taŭgas por kombinita metodo, tio estas duone rekta kaj duone gramatika. Ĝi vere enhavas leg- kaj instrumaterialon sufiĉan por plena ellernado.« (G. S. E', 1931, p. 167.) Pro konfisko de pluraj miloj da e-roj en germana presejo, en 1934 aperis 6-a eld.

Petroviĉ S. Svetislav, serbo, prof. de porinstruista lernejo en Piroto. Nask. 1899 en P. Lernis E-n en Francujo. Verkis lernolibron por serboj, 1926.

Pettera, aŭstrianano, d-ro. Mortfalis dum la milito. Unu el la pioniroj en Stirio. Gvidis multajn kursojn.

Pezlederer (peclederer) Wolfgang, aŭstro-germano, d-ro, juĝisto. Nask. en 1856, mortis en 1926. E-isto de 1911. Unua del. de UEA en Salzburg, kie li fondis ankaŭ ES. Estis ekzamina komisararo de GEI.

Pfeffer (pfefer) Emil, d-ro jura kaj absolvinto de fil. fakultatoj (historio, geografio, lingvistiko). Nask. 16 dec.

1891 en Krakovo, Polujo; patro Adolfo, patrino Luiza Disraeli. E-isto de la unua junaĝo. Ankoraŭ 17-jara E-igis el la latina »Amoro kaj Pishe« de Apulejus. Poste aperis de li en libroformo »Kvin prelegoj pri bakterioj« de prof. Buiwid; »Ekonomio socia« de Marchlewski, »E en 10 lecionoj« por poloj (laŭ Cart), »E-a Pola Konversacio«. Poligis »Die Welt-sprachenfrage und E« de Ostwald. De 1925 aperigas sisteman serion de (ĝis nun) 9 diversaj lernolibroj, vortaroj kaj legolibroj en la viena »Tagblatt-Biblioteko«; suma disvastiĝo ĝis nun proks. 100.000 e-roj. Redaktis: »Kongresa Bulteno«, Krakovo, 1912 (kun Kronenberg), »Kongresa Bulteno«, Wien, 1924 »La E-isto«, 1919-20, »Weltsprache« 1930-31. Kelkdek artikoloj literaturaj kaj prilingvaj, poeziaj, dissemataj en la E-a gazetaro. Nuntempe li estas vicprez. de Aŭstria E-Asocio. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Pfeiffer (pfajfer) Włodzimierz, polo, libraro en Lodzo. Nask. 25 sept. 1890 en Plock. Multjara UEA-del., fervora prop-isto.

Phillimore (filimor) William, anglo, instr. Nask. 8 nov. 1844. E-isto de 1905. Lernis Braille-skribon en 1910 kaj transskribis de tiu tempo ĝis nun multajn librojn por blinduloj, inter ili laste la verkon »Tridek Jarojn en Ora Nordo« por blindulo en hospitalo. Mortis 15 nov. 1934.

Phillips (filips) Henry, usonano, advokato. Nask. 6 sept. 1838 en Philadelphia, mortis 6 junio 1895. Numismato, filologisto, antikvisto; aŭtoro de multaj verkaĵoj pri tiuj temoj. Sekr. (1884) kaj bibl. (1885) de Amerika Filozofia Societo (v.). Ano (1887) de komitato elektita de AFS por ekzameni la sciencan valoron de Volapük. Tradukis (1889) unuan libron de Z kun antaŭparolo kaj vortaro.

Phipps (fips) Walter Glover, anglo, komizo. Nask. 24 jul. 1885 en Cheltenham. Sekr. de la Ch-a grupo, 1913-26. Del. de UEA, 1914—30.

Pichon (piŝon) Charles, franco, literaturisto kaj ĵurnalisto. Nask. 17 okt. 1893 en Saumur. De 1908 propagandis E-n inter la junuloj. Fondis la Francan Federacion de Junaj E-istoj, kaj ties

organon, la gazeton »Juneco«. Kunlaboris en »La Revuo«, »Juneco«, k. a. Direktis la gazeton de la Deka Kongreso.

Pickard (pikard) John William, anglo, kontisto. Nask. 16 jul. 1866 en Leeds. E-isto de 1899. Dum 4 jaroj prez. de Manchestera ES.

Pino Alegret Andrés, hispano, advokato. Nask. 20 okt. 1878 en Valencia. E-isto de 1906. Partoprenis 12 UK-jn, dum la 5-a organizis postkongreson al V. Kunfond. Int. Societon de E-istaj Juristoj. Dumviva membro kaj del. de UEA. Fervora prop-isto. Estis kunlaboranto de »La Suno Hispana«. Publikigis kelkajn broŝurojn. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Pinokjo. Verko de C. Colloidi, el la itala trad. M. Marchesi, 1930, 150 p. »P. estas fabelo de la plej senbrida fantazio, sed realeco viva. Kunfando de la revado pri aventuroj kaj mirindaĵoj kun la vivo, kia ĝi estas. Ĝi bonege taŭgos en la mano de dua-gradaj kursanoj.« (El la Antaŭparolo de K.)

Plitk Augustin, ĉeĥoslovako, d-ro fil., supera sekr. en komerca ministerio en Praha. Nask. 24 jul. 1883 en Bavorov. E-isto de 1902. Partoprenas diversmaniere la movadon. En 1912-13 li travojaĝis Eŭropon kun lumbild-parolado E-lingva, kaj per tio multe helpis la propagandon. Li parolis en 33 urboj de 11 ŝtatoj antaŭ sume 9370 homoj pri »Praha, popolaj kostumoj kaj Sokolaro«. Ĝen. sekr. de la UK en Praha, 1921. De 1922 lektoro de E ĉe la ĉeĥa teknika altlernejo en P. En 1923 li fondis la ĈEI, kies prez. li estas daŭre. Komitatano de diversaj E-organizaĵoj. De 1930 vicprez. de CAE. Ano de la ŝtata ekzamena komisiono. Laboris por aperigo de E-turismaj eldonaĵoj; tradukis al E eldonaĵon de la fervoja ministerio. LK. Posedas distingilojn finnan kaj francan.

Pjeev Todor, bulgario, instruisto, poste: prez. de revolucia komitato, elmigrinto, post la liberigo de B. alt-ranga ŝtatoficisto. Nask. en 1838 en Etropole, mortigita 26 jul. 1904 en Sofia. Estante jam maljunulo li farigis varmega adepto de E. Fondinto de la unua E-klubo en Sofia, dec. 1902.

Plehn (plen) Hans Joachim, germano, teknikisto-komercisto. Nask. en 1905. E-isto de 1922. Organiza, instrua, propaganda laboro en Breslau. Ekzameno pri scienca kapableco ĉe la germana E-Instituto. Verkis i. a. kvinlingvan vortaron pri segiloj. Nuntempe redaktisto-oficisto ĉe Enciklopedia Vortaro de Wüster.

Plena Verkaro de V. N. Devjatnin. Unua libro 1906, 136 p. (Versoj, Boris Godunov, Demono). Dua libro 1906, 144 p. (Edziĝo, Arturo, Ludilo, Episkopo, Poltavo de Puŝkin). Tria libro, 1908, 137 p. (Versoj, Ruslano kaj Ludmilo). Kvara libro, 1911, 167 p. (Versoj, Fabeloj de Krylov, Nefinita dramo). »La plej grandan atenton ni devas doni al la originalaj verkoj, precipe kiam ili estas ŝulditaj al iu el niaj nepri-diskuteble plej lertaj kaj famaj majstroj en la lingvo. Bonega stilisto.« (L. I. 1911, p: 529.)

Plena Vortaro. Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-Franca. Verkis Boiraca 1909, XXII kaj 430 p. »Granda repertuaro de ĉiuj E-aj radikvortoj, troveblaj ne nur en E-naciaj kaj naciaj-E vortaroj, sed ankaŭ en la diversaj Vortaroj Teknikaj, kaj eĉ en la verkoj literaturaj, filozofiaj, sciencaj, ktp. En ĝi, la aŭtoro penis atingi, pri la E-a difino de ĉiu vorto, kiel eble plej malgrandan nombron da vortoj. Plie, li aldonis al ĉiu E-a difino la francan tradukon.« (Laŭ Scienca Gazeto, 1912.) — »E difinoj malprecizaj; entute 10.000 radikoj, el kiuj multaj samsencaj, sinonimaj.« (BIL, p: 233.) — »Mode'o de la malfacia uzebleco.« (Kopar, L. M. 1931, p: 49.)

Plena Vortaro de Esperanto. Verkita de Grosjean-Maupin, Esselin, Grenkamp-Kornfeld, Warringhien. Eld. SAT, 1930, 517 p. En 1933 jam elĉerpita. »Zorge farita, ampleksa kaj detala, vere grandvalora verko. La Vortaro ne donas sole vortklarigojn, sed montras la uzon de la vorto per fraz-ekzemploj el bonaj aŭtoroj, precipe de Z. Per siaj tre zorge redaktitaj Z-ekzemploj li fiksas por ni la tutan Z-an lingvo-uzon. Ampleksaj gramatikaj kaj vortderivaj klarigoj kaj vere admirinde zorge farita sinonimaro kompletigas la verkon je dezirinda kaj nemalhavebla vortaro.«

(Kopar, L. M. 1931, p: 49.) — Dua, plivastigita eldono en 1934, 511 p.

Pocelujevskij Alek. Petrovič, sovetiano, blankruso, docento de pedagogia superlernejo en Aŝhabad. Nask. 1894. Prez. de Turkmenia komitato de SEU. Pli frue li laboris en Vitebsk kaj Moskva.

Poel (pul) ?, nederlandano, katolika pastro. Kunfondinto kaj estrarano de NKEL. Prez. de la katolika E-kongreso en Hago.

Poemaro el Hungarlando. Tradukoj el 53 hungaraj poetoj de la XVI-a jarcento ĝis niaj tagoj, trad. de Fr. Szilágyi. 1929, 95 p. »Enhavo zorge kaj delikate elektita. Arta gusto.« (Jobo, »Hungara Heroldo«, 1929, A. 7.)

Pointer (pojnter) Ernest, anglo. Nask. 16 majo 1909. E-istiĝis en 1907. Sekr. de grupo en Bedford. Fervore propagandis por UEA, aranĝis vojaĝon de Privat en Anglujo.

Pola Antologio. Kompilis kaj trad. Kabe. 1906, 155 p. Prozaĵoj kun modela stilo.

Pola Esperantisto (Esperantysta polski). Monata revuo, organo de la Poluja E-istaro. En lingvoj E-a (plejparte) kaj pola. Unue organo de l' loka ES en Lvovo, julio 1906. En jan. 1908 la revuo eliras jam en Varsovio. Ĉefred. d-ro Leono Zamenhof, eldonanto kolonelo J. Günther ĝis 1914. Dum kelkaj unuaj jaroj de l' milito la revuo ne eliradis. En 1923 (post 1-a Tutpola E-Kongreso) la redakcion transprenis Karolczyk, L. K. kaj eldonadis ĝin sufiĉe regule, sed en malgrandigita formato. De 1926 oficiala organo de PED. E. WIESENFELD.

Pola Folkloro kaj Popolkanto. Originale de S. Grenkamp. 1933, 64 p., kun muziknotoj kaj bildoj. »En la koncize komponita verketo oni unue renkontas historie geografian skizon kaj ĝin sekvas sintezo de la popola karaktero; en tria ĉapitro la verkinto traktas la popolan poezion kaj en la sekvanta la popolan kanton.« (Joĉjo, »Svenska Arbetar E-isten« sept. 1934.)

Polgár Izoro Jozefo, hungaro, presisto. Nask. 13 aug. 1883 en Temesvár (nun Timiŝoara en Rumanujo). Laboris kiel kompostisto en Budapeŝt, en Svisujo, de 1908 en Paris. En 1912

reiris al Budapeŝt, kie li restis ĝis 1914; tie li kunfondis HESL. Reiris al Paris, kie li estis multajn jarojn dir. de presejo. Post la morto de lia frato Viktor P. li akiris la Centran Presejon E-istan (v.) en Paris. Multnombraj paroladoj, artikoloj kaj kursoj. Verkis gramatikojn por hungaroj, 1913, sep eldonoj.

Polgár Viktoro, franco el hungara deveno, presisto. Nask. 15 jan. 1877 en Temesvár, mortis 9 jul. 1933 en Verrières-le-Buisson, apud Paris. Laboris unue kiel kompostisto dum ok jaroj, iris al Paris en 1904, kie li estis dungita kiel laborestro de l' Presa Societo E-ista, kies posedanto li fariĝis en 1908. Tre aktiva prop-isto, fervora defendanto de la netuŝebleco de la »Fundamento«. Gvidis E-kursojn dum 10 jaroj en Parizaj lernejoj. »Kiam s-ro Cart tiom energie batalis por fondi la SFPE, li trovis la helpon de s-ro Polgar, kiu, tiam tute malriĉa, tamen eldonis je siaj propraj kostoj la du aŭ tri unuajn jarlibrojn de tiu naskiĝinta societo kaj tiel ebligis ĝian kreadon.« (E', 1933, p: 155.)

Polico. Estas merito de la iama hungara polica inspektoro, Aŭgusto Marich, kolekti unue izolulojn al unueca organizo. En 1908 li eldonis la gazeton »Polica Revuo«, sed monmanko tre baldaŭ ĉesigis ĝin. En 1911 la prez. de la P. Klubo E-ista de Paris A. Miguière kaj ĝia sekr., E. Tison, policinspektoroj, fondis la Int. E-istan P. Asocion kaj eldonis revuon »Int. P. Bulteno«. Samjare en Antwerpen fondiĝis E-ista P. Asocio, kiu ne etendiĝis al aliaj landoj. La milito ĉesigis ambaŭ unuigojn.

En 1922 Marich eklaboris, en Budapeŝt eldonis novan revuon »La Policisto«. Dum la UK en Nürnberg 1923 policistoj el 6 landoj fondis la Tutmondan Polican Ligon (TPL), laŭ iniciato de Marich, kiu nomiĝis ĝenerala direktoro. Iom post iom Marich agis tute memvole, fondis pliajn ligojn profesiajn, celis unuigi ĉiujn kune kun la anoj de TPL en Tutmonda Ligo de la Ordo. Li emis ordigi la ordon kaj fine atingis faoson kompletan. Li uzis fantaziajn statistikojn pri miloj da membroj kaj sekretarioj, daŭre eksperimentis per provoj laŭ subitaj

ideoj. Malgraŭ promesoj kaj certigoj, La P-isto aperis ne regule, ĉiujare nur kelkfoje, ĝis fine en 1928 ĝi malaperis. Post dujara silento li ekeldonis en Nederlando La P-iston mimeografite, ŝajnigante per enan interkonsenton de la ligano.

Multe da energio, tempo kaj mono estis perditaj per la agado de Marich, sed per helpo de ICK kaj UEA la reorganizado de la ligo iom post iom sukcesis. Vicprez. P. Beier, dir-oj A. Pohle kaj P. Teuchner, ĉefkas. A. Gräfe dissendis dumil alvokojn al ĉiuj liganoj por inviti ilin, fondi novan pli bonan ligon. Rezultato: centoj de la enregistritaj atoj ekzistis nur sur papero, krom 50 anoj el Leipzig apenaŭ la sama nombro de la iamaj anoj de TPL respondis kaj deklaris realigon al la nova ligo, kiu nomiĝis Int. P. Ligo (IPL, 1930, Dresden). Prez. fariĝis d-ro M. Ruth en Bern, liga dir. P. Teuchner en Leipzig, ĉefkas. A. Gräfe en Chemnitz, red. A. Pohle en Dresden. IPL interkonsentis kun UEA pri reciproka interŝanĝo de servoj.

Ĉefe post la mondmilito diversaj registaroj kaj magistratoj interesiĝis pri E kaj ĝia enkonduko en la polico. Specialaj kursoj por policistoj efektiviĝis en 1907: Stockholm, en 1909: Bucuresti, Galatz, Dresden, Godesberg, en 1914: Paris, en 1916: Harbin, en 1921: Lisboa, en 1923: London, en 1924: Athen, Leipzig, Linz, Wien, Tallinn, en 1925: Warszawa kaj ĉiuj pli grandaj urboj de Pollando, Graz, Antwerpen, en 1930: Berlin, Antwerpen, en 1931: Oslo, Oecu (Japanujo), Kolding, Riesa, Hamburg, Lisboa. Dume en aliaj lokoj nenomitaj en polica rondo nur ekflamis la lernado, sed en la nomitaj urboj ĝenerale oni fondis grupojn, kies parto trovis registaran kaj magistratan subtenojn. En 1923, 1924, 1926 la sakslanda ministerio de interno pagis E-kursojn el ŝtata kaso en Leipzig, Chemnitz, ĝendarmaj stacioj Arnsdorf kaj Rode-wisch sub la kondiĉo, ke la kursa partopreno estu deĵora devo. En 1927 la saksa ŝtata policadministracio aplikigis la ekzamenregularon por fremdlingvaj lernantoj ankaŭ por E. En 1930 en Berlin la polieprez. disponigis por tri Ĉeh-kursoj kun pli ol ducent

policistoj instruejon senkoste kaj ĉiujn elspezojn por instruado pagis la prusa ministerio de interno. En 1921 la sakslanda kaj en 1926 la prusa ministerioj dekretis, ke E-policistoj portu post sukcesa ekzameno la E-insignon. Enkonduko de E en policaj lernejoj okazis en 1920: Madrid, en 1924: Bucuresti, Wien, Linz, Weimar, Hann-Münden. En 1921 la polica direkcio en Leipzig ordonis establon de E-dejorejo, sekvinta la ekzemplon de Dresden.

Ni aldonas ankoraŭ, ke multloke la E afero bone komenciĝis, sed post finiĝo de la kurso la intereso malfortiĝis kaj fine ĉesis, kvankam la dekretoj publikigitaj ankoraŭ validas. Gravan rolon ludos la uzado de E en la kriminala fako kaj IPL atendas tion post ne longe.

Komence de 1933-a jaro IPL ricevis gravan instigon. Akceptis la oficon kiel ligitadanto Mouton, »Conseiller d'État«, Prefekturo de Polico, Paris.

Policfaka gazeto »Int. Polica Bulletin« de 1911 ĝis 1914 organo de IPEA reviviĝis, aperinta kiel monata polica fakrevuo kaj oficiala organo de IPL, kvina jaro — dua serio No. 1. (No. 16) junio 1933. Administranta redaktoro: A. Schwartz, »Inspecteur de police spéciale«, Strasbourg — Meinau. Rue Engelhardt. Francujo.

PAUL TEUCHNER.

Poliglota Vademecum de int. Farmacio. Kompilis C. Rousseau. 1911, 288 p. Enhavo: Profesia vortaro naŭlingva. Multaj formuloj eltiritaj el farmakopeoj eŭropaj, amerikaj, japanaj; Formularo de multaj preparajoj, ktp.

Polizoid's Laskaris, greko, tabakvendisto en Sidirokastro. Nask. 1895 en Melenikon (Makedonio). Fondis grupon, estas unu el la plej fervoraj H. E-istoj.

Poljanskij Sergej Feodoroviĉ, ruso, oficisto. Lernis en gimnazio en Simbirsk (nun Uljanovsk) kaj poste en universitato en Kazan. En 1887 kune kun Lenin li estas eksigita el la Kazana universitato pro partopreno en studenta kunveno. Aŭtoro de »Kurioza sunhorloĝo«, unu el la plej malnovaj originalaj E-verkoj. Fondinto de E-

Societo en Habarovsk ĉe Amur (1899), la unua ES en Ekstrema Oriento. Poste laboris en Kielce, Petrozavodsk kaj nun en Leningrad.

Pollando, Ilustrita Gvidlibro tra —. Originalo de diversaj aŭtoroj 1927, 116 p. kun landkarto. Konatigo de la vidindaĵoj de la tuta lando (kune kun Danzig), kun historiaj notoj.

Pollen John Ll. D., irlandano, juĝisto ktp. Nask. 3 jun. 1848 en Kingston, mortis per enfalo en la maron ĉe insulo Man, 18 jun. 1923. Restadis en Hindujo 1871—1903. Ĉie en Hindujo kaj ĉe vojaĝado orientlande li propagandis E-n. Unu el la »Trio por la Tria«. Prez. de BEA, 1904—12. Verkis hindustanian »Slosilon«, verŝajne baldaŭ presotan.

Pol-Pomeran'o. Verkis K. Smogorzewski, el la franca tradukis S. Grenkamp-Kornfeld, 1932, 128 p., 22 entekstaj kartoj 4 plurlokaj kartoj. Libro pri la »germana-pola problemo«, precipe pri la koridoro, el pola vidpunkto.

Poltavskij S. P., ruso, literaturisto en Saratov. Verŝajne la unua rusa ĵurnalisto, uzinta E-n, kiel senperan praktikan ilon por lit. interrilatoj kun eksterlando. Liaj artikoloj pri rusa socia-politika vivo, verkitaĵoj en E, estis presitaj en eksterlandaj gazetoj. Kelkaj liaj rakontoj kaj versaĵoj aperis en »Ruslanda E-isto«, »La Simbolo«, »La Ondo de E«.

Polujo. Antaŭ la mondmilito P. kiel sendependa ŝtato ne ekzistis, sed dividita je tri partoj en 1795 — ĝi estis regata de Rusujo (t. n. Pola Reĝlando), de Aŭstrujo (Malgranda P. aŭ Galicio) kaj de Germanujo (Granda P.). La parto regata de Rusujo — pro mallongeco nomota plue P. — estas la patrujo de E kiel ankaŭ de ĝia kreinto.

La historio de E en P. havas ankaŭ praperiodon, kiam ekzistis nur la prototipo de E, la t. n. »Lingwe Uniwersala«. 5 dec. 1878 Z — gimnaziano — festis kun siaj gimnaziaj kolegoj »la ekvivigon de la lingvo«. Laŭ tiutempa kredo de Z la lingvo jam havis sian difinitan formon kaj la aŭtoro jam komencis verkadi en tiu lingvo. Tiutempe la solaj E-istoj vivis en Varsovio. La unua E-isto

estis iu Waldenberg, kiu tiam kunfests la solenon de Lingwe Uniwersala, (kaj kiu poste pri la efektiva E preskaŭ ne okupiĝis).

Ekde 1878 Z studas la viveblecon de sia lingvo. Intertempe li ekkonas Volapükon kaj forlasas sian lingvon por atendi kaj konvinkiĝi ĉu Volapük respondas la kondiĉojn bezonajn por L. I. Post kelkaj jaroj Z disreŝiĝas pro Vo'apük. Tiam estis ankaŭ granda la merito de lia patro, kiu lin ĝuste helpadis en tiu analizado kaj instigadis al ĉiama perfektigado, por ke la lingvo aperu antaŭ la mondo jam en senproĉa ŝtato. Tiu fazo daŭris 9 jarojn.

En 1887 Z prezentas al ni la finitan formon de L. I. En Varsovio eliris la 21-an de majo la unua broŝuro (en rusa lingvo) pri E. En la disvastigo helpis al Z liaj parencoj. Iom post iom revenas eĥoj. Z komencas enregistradĉi ĉiun nomon revokantan, kolekti subskribojn.

En la unuaj jaroj, t. e. ĝis 1893 nur izoluloj, havantaj iajn rilatojn kun ia familio ekinteresiĝis pri E pro simpla scivolemo. Kiam la ideo pri L. I. komencis — pro la progresoj de Volapük — penetri la gazetajn kolonojn, komencis jam tie kaj alie interesiĝi pli serioze diversaj homoj kaj turnadis sin al la aŭtoro kun diversaj demandoj.

La unuaj sonoj E-aj aŭdiĝis inter Z kaj Ing. Antoni Grabowski (ne kalkulante la e-ajn babiladojn inter la Z-aj familianoj). Inter la unuaj interesiĝantoj estis la poeto Leo Belmont kiu jam en 1887 skribis entuziasmoplenan leteron al Z. Iom post iom aperadis aliaj apostoloj de E, precipe inter la studenta junularo.

Pri movado en tiuj tempoj oni eĉ ne povis revii: de unu flanko la registaro (rusa) rigardadis malfide je ĉiajn organizita movado, aliflanke la polaj socioj, kiuj estis devigataj batali por sia nacia lingvo kaj kiuj bone konsciis kiom forte la rusa registaro penas ekstermi la polan nacian senton, ankaŭ suspektadis ion en tiu ĉi movado: ĉu ne kaŝas sin sub tiuj pioniroj iaj agentoj de la rusa registaro? Do la eklernado de E en la unuaj jaroj en P. okazadis indivi-

due, aranĝi movadon oficialan estis tiutempe neeble.

Kaj tamen, malgraŭ tio, P. partoprenis en la disvolviĝo de E plej aktive kaj donis ekde la unuaj tempoj al la mondo la plej eminentajn E-istojn. Nur citi tiajn nomojn kiel Grabowski, Kabe, Belmont, Zakrzewski, Wasniewski, Róbin, Erzostowski, Neumann.

La unua kunsido, dum kiu estis tuŝita la temo pri la ajn organizo, okazis 2-an de dec. 1893 en Varsovio, en la loĝejo de la studento St. Goldberg. Ĉeestis kvin personoj (inter kiuj la sola nun vivanta W. Róbin). La kunsidoj poste okazadis pli malpli regule, sed ĉiam ankoraŭ ne leĝigite. Z tiutempe ne troviĝis en Varsovio kaj la grupeto transsendis al li en Grodnon siajn salutojn.

Intertempe E diskoniĝadis en Eŭropo. Tie kaj alie malfermiĝadis societoj. Ankaŭ en Rusujo tia societo malfermiĝis kaj agis jam tutè malkaŝe, laŭleĝe. La varsovia grupo, volante agi ankaŭ malkaŝe, fariĝis filio de tiu rusa. Kaj la 6. dec. 1904 (ĝuste 11 jarojn post la fondiĝo de l' unua — neleĝigita — grupo) la varsovia E-istoj fondis la unuan oficialan organizaĵon E-an en P. »Varsovia Societo E-ista«. Z, kiu intertempe ree ekloĝis en Varsovio, rifuzis funkcion kaj tial fariĝis prez. Grabowski, vicprez. Leo Belmont, sekr. Kabe, kas. Zakrzewski, kaj bibliotekisto Brzostowski. Malgraŭ, ke en Rusujo la kondiĉoj tiutempe estis plej fatalaj (milito kun Japanujo, revolucio en la lando, malfido de la pola socio al ĉio, kio havis ion komunan kun rusoj — kaj la varsovia societo estis filio de la rusa — suspektemo al la E-istoj mem), la nombro de la E-istoj post la unua jaro atingis jam 70.

Laŭ la regantaj tiam kondiĉoj, nenia presajo povis aperi sen la permeso de la rusa cenzuro. La sola inter ĉiuj rusaj cenzuristoj, kiu posedis E-on, loĝis en Peterburgo kaj eldono de E-a organo en Varsovio ne estis ebla. La polaj E-istoj estis devigataj kontentigi per la Nürnberga »Esperantisto«.

La pola teritorio en tiu tempo estis dividita inter tri regnoj. Ciu el tiuj

tri partoj: Polujo (rusa), Galicio (aŭstra) kaj Grandpolujo (germana) havis sian apartan politikan kaj ekonomian vivon. Tamen la spirita kunvivo — precipe inter la rusa P. kaj Galicio — ne estis interrompita. La gazetaro eliranta en unu terparto estis legata en la dua, libroj eldonataj en Galicio estis multe disvendataj en la Rusa P. kaj inverse. Tiel la interrilatoj inter tiuj du landpartoj estis sufiĉe viglaj.

En Galicio la E-a movado komenciĝis per individua ekkono de E. Nur izoluloj en plej grandaj urboj komencis propagandi. Sub la aŭstra reĝimo tio ne renkontadis malfacilaĵojn kaj tial baldaŭ naskiĝis organizita movado. 1906 povas esti konsiderata kiel oficiala dato de E movado en Galicio. Tiam fondiĝis jam grupoj en Krakovo kaj Lvovo (tiam nomata en la E-aj oficialaĵoj: Leopolo) urboj, kiuj fariĝas la bazoj de l' disvolviĝo de E en Galicio. El tiuj ĉi urboj propagandistoj disvastigas E-n tra la provincaj lokoj, fondante tie kaj alie filiojn kaj subtenante ilin en momentoj de bezono.

La ambaŭ grupoj tre fervore kaj truktodone laboris. La Krakova eligis poste tre konatajn E-istojn: prof. Bujwid, Kuhl, d-ro Rosenstock, Kaszycki, Alfus, Grenkamp kaj aliajn. La Lvova ankaŭ laboris fervore, ankaŭ ĝi edukis poste fervorajn E-istojn: d-ro Fels kun edzino, d-ro Mikolajski, Lazica, Schnützer, Wierzychowski, k. a. Plej granda ĝia merito estas tamen tio, ke en julio 1906 aperas la unua numero de »Pola E-isto« — organo de Societo »Esperanto« en Leopolo — ĉiumonate kaj regule eliranta.

Kiam post du jaroj tiu ĉi revuo transportis sian eldonejon aliloken, Mikolajski komencis la eldonon de l' unua faka E-a revuo: Voĉo de Kuracistoj. En Lvovo en 1908 estis ankaŭ fondita la unua »Teknikista Grupo de E-istoj«, kies animo estis W. Gieruszkiwicz. La Lvovaj E-istoj baldaŭ komencis la propagandon laŭ vasta stilo.

En multaj provincaj urboj estis malfermitaj kursoj. Tiel do fondiĝis grupoj en Tarnopol, Nowy Sacz, Sanok,

Belz, Sambor, Stryj, Tarnów, Stanisławów, Jarosław kaj tre multaj aliaj. En »Pola E-isto« red. de St. Łazica komencis baldaŭ kunlabori ne nur lokaj samideanoj. Ankaŭ Krakovo kaj eĉ la translima Varsovio evidentigis sian helpemon kaj per abonado kaj per kunlaborado. La plumoj de Z. Leono Z., Grabowski, Belmont, Kabe kaj aliaj tre ofte plenigadis la kolonojn de la Lvova revuo.

La polaj E-istoj el la rusa terparto fine akiris la eblon havi sian organon, kiu, kvankam aperante »eksterlande«, tamen estis ja voĉo de l' pola E-istaro. La polaj E-istoj jam delonge estis pledintaj, ke la rusa registaro leĝigu polan societeton, t. e. ne nur por la urbo Varsovio, sed por la tuta pola tero, regata de Rusujo (kun rajto malfermi filiojn). Tio estis ankaŭ bezona por la normala disvolvado de E en P., ĉar ĉiu nova societo fondiĝinta estis devigata klopodi pri nova leĝigo, kio plene dependis de la lokaj estraroj, kiuj ne ĉiam rapidis permesi. Tial estis pli oportune ne malfermi novajn societojn nur filiojn de la jam ekzistantaj.

La politikaj kondiĉoj en P. iom mildiĝis, post la rusa revolucio en 1905 — ĉi la popolo ricevis iom da libereco. En 1908 la poloj fine sukcesis leĝigi sian societeton. Pola E Societo gajnis la simpatiojn de la polaj medioj, kiuj iom post iom komencis fide rilati al ĝi. En 1908 la varsoviaj samideanoj eldonis lokan gazeton.

La redaktejo de »Pola E-isto« transiris tiam Varsovion, kie komenciĝis ĝia floranta periodo. Dum jaroj kolonelo Günther financis ĝian eldonon kune kun ĝiaj multaj literaturaj alikaj eldonoj. La ĉefred. estis d-ro Leono Z. Kunlaboris Z. Grabowski, Kabe, Zakrzewski, Brzostowski k. a. La redakcio do kunigis la polajn plumojn de ĉiuj terpartoj. Sed ne nur polaj plumoj tie trovis lokon. Eminentaj eksterlandanoj (Cart, Lengyel) sendis siajn elaboraĵojn. La revuo eliradis regule (dulingve) ĝis la eksplodo de la milito.

Ekde 1908 la pola E-istaro laboradis tre vigle kaj sukcese sur la propaganda kampo. Oftaj prelegoj (alvenadis eksterlandanoj kaj prelegadis:

Parrish, Privat k. a.) teatraĵoj, koncertoj, kursoj ktp. allogis iom da indiferentuloj. Kaj la pola E-istaro volis inviti la tutmondan samideanaron al si. Sed la rusa registaro ja ne ĉiujn el la eksterlandanojn enlasis (ekz.: socialistojn, liberpensulojn kaj aliajn »nefidindajn« personojn), krom tio: Polujo ja ne estis »mastrino ĉe si hejme« (kiel tion priskribis Grabowski en sia salutpoeziaĵo »La reveno de l' Filo« dum la U. K. en Krakovo).

Ree venis helpe la translimaj fratoj el Galicio. Kaj en 1912 okazis impona jubilea UK en la muroj de l' malnova urbo, iama rezidejo de la polaj reĝoj — Krakovo, kiu allogis 1000 E-istojn de la tuta mondo. La brila kongreso kontribuis forte al plua disvastiĝo de E en P. Aperadis novaj grupoj, novaj kursoj, fariĝis vigla movado. En kelkaj lernejoj kaj gimnazioj E estis enkondukita (instruis Grabowski, Lipski k. a.) En la Krakova Universitato fondiĝis grupo (gvidis Kriss, Kronenberg).

Sed jen venis en 1914 la mondmilito. P. fariĝis tereno de la plej grandaj fajroj. Ekde 1915 P. jam ne havis sian rusan mastron. Anstataŭe venis germana kaj aŭstra. Nun la polaj teroj ne estis dividitaj inter si per limoj. En 1917 renaskiĝis la E movado en Krakovo. Ĉar la pleja parto de la iamaj aktivuloj servis en la milito, oni devis komenci ĉion denove. En apr. 1918 la grupo jam aperigis ĵurnalon »E-ista Voĉo« sub red. de S. Grenkamp Kornfeld. En Varsovio la movado ekzistis nur kiel simplaj renkontoj de samideanoj, ĉu en kafejoj, ĉu ĉe la aŭtoro de E. Sole la multjara delegito de UEA, Oberrotman, kuradis de unu E-isto al alia por enkasigi kotizojn — tiam la sola simptomo de la vivanteco de E.

En 1917 la pola E-istaro travivis grandan ekskuon: la morton de la Majstro. Oni aranĝis la funebran ceremonion kun ebla soleneco. (v. Entombigo de la Majstro.)

La galiciaj samideanoj baldaŭ revivigis ĉe si la movadon kaj per sia organo »E-ista Voĉo«, kiun ili disvastigadis ankaŭ en la ceteraj partoj de P. kaŭzis la revivigon de E ankaŭ en Varsovio. Intertempe — en 1918

— P. liberiĝis de ĉiuj okupantoj kaj fariĝis sendependa ŝtato kaj ĉiuj ĝiaj terpartoj ree unuigis. En 1919 fondiĝis en Varsovio la unua laborista (klasbatala) societo »Laboro«, kiu baldaŭ evidentigis tre viglan agemon. En 1921 fondiĝis la E-ista rondo »Konkordo«. Ĉiuj ĉi societoj agadis tre energie kaj fondadis multe da filioj.

En 1922 estis organizita la Unua Tutpola E-Kongreso, kiu havis brilegan sukceson. La tiama ĉefulo de la ŝtato — Józef Piłsudski — sendis sian reprezentanton (generalon Jacyna), S-ino Klara Z, edzino de la Majstro ĉeestis, la tuta loka kaj provinca gazetaro ekinteresiĝis kaj E ekde nun havis malfermitajn pordojn en ĉiuj oficialaj institucioj.

En 1923 malfermiĝas ankoraŭ unu tre vigla rondo en Varsovio: AERO (Akademia E Rendo). Tiel do Varsovio posedas jam kvar societojn. Iom post iom en tiu urbo fondiĝas ĉiam novaj (fakaj) societoj, kio kontribuas al la ĉiam plia populariĝo de E. Ankaŭ la provinco jam ekmoviĝis. Post la I. Tutpola Kongreso fondiĝis societoj en Białystok, Bydgoszcz, Łódź, Płock, Wilno ktp.

Krom tio ankaŭ komencas disvolviĝi en P. la internaciaj societoj (UEA, TEKA, SAT, ISAE, IKUE k. a.) La movado jam komencas dispartiĝadi. Tial oftaj konferencoj inter ĉiuj societoj por unuecigi la planon de l' propaganda taktiko estis bezonaj. Okazadas ofte tiaj interkonsultoj, konferencoj kaj kongresetoj (kelkfoje eĉ po kelkaj dum unu jaro).

Samtempe laboris tre vigle en Varsovio la Monumenta Komitato por starigi la monumenton sur la tombo de Z. En tiun komitaton (sub prezido de d-ro Robin kaj sekretarieco de Wiesenfeld kun la aktiva partopreno de Klara Z) estis invititaj reprezentantoj de ĉiuj societoj en P. Rezulte de tio okazis la 16-an de apr. 1926 je la naŭa datreveno de morto de Z solena malkovro de l' Monumento.

En la sama jaro okazis en Krakovo kongreseto de ĉiuj polaj societoj kaj oni decidis unuigi la tutan Polan movadon per unu organizaĵo. Tiel nas-

kigiĝis la ĝisnuna reprezentanto de la tuta E movado en P. — PED (Pola E. Delegitaro), al kiu kun fluo de la tempo aliĝis preskaŭ ĉiuj societoj en P. Ekde tiu tempo la E societoj laboras tre intense.

La Varsovia AERO gvidas senĉese multajn kursojn (po 8—10 dum unu jaro), aranĝas prelegojn, akademiojn, E-semajnojn, ekskursojn, kongreskaravanojn ktp. La societo Konkordo evidentigas ne malpli energian vivantecon (por propraj kostoj dufoje sendis sian delegiton al Int. Kongresoj U. K. en Vieno kaj Genevo). Pola E Asocio (la iama Pola E Societo intertempe ŝanĝis sian nomon) aranĝas kelkajn siajn proprajn konferencojn kaj eĉ kongresetojn, revivigas la organon »Pola E-isto«.

En aliaj urboj la laboro iras ne malpli vigle. Menciinda estas speciale Białystok, la naskiĝurbo de Z kaj Łódź, kiuj la nunaj akiris en P. la stratojn Zamenhofajn. Ankaŭ Krakovo, kiu ekde 1926 fariĝis la sidejo de PED, ne restas malantaŭe kaj kunvokas la duan Tutpolan Kongreson en 1928 al Krakovo.

En 1927 la varsovianoj aranĝis imponan manifestacion. UK en Danzig venis fini siajn du lastajn tagojn al Varsovio kaj fari pilgrimon al la tombo de la Majstro. Tiu preskaŭ-kongreso donis la eblon al la tutmonda E-istaro viziti la tombon de Z.

PED kiel ĉefgvidanto de la movado tenas ĉiujn risortojn en siaj manoj kaj regulas la planecon de l' propagando kaj disvolvo. »Pola E-isto« fariĝis jam oficiala organo de PED kaj transportiĝas Krakovon, kie ĝin redaktas kaj regule eldonadas prof. Bujwid kaj Hodakowski kun la administristo de L. Kutscher.

En 1929 okazis la tria Tutpola Kongreso dum la fama ekspozicio en Poznan. Kaj tiel jam regule ĉiujare — landa Kongreso. E jam estas respektive vidata en oficialaj rondoj. La Ministerio Eksterafara jam kunhelpas (kaj subvencias) la eldonon de »Gvidlibro tra Pollando kaj Gdansk«, la prez. de la pola respubliko akceptas delegacion E-an, en la universitatoj okazas oficialaj lekcionoj.

En 1928 la plej nevenkebla fortik-

ajo ankaŭ cedis: La 15 XII. tra la radiostacio en Varsovio disaŭdiĝis la unuaj E-aj vortoj de Wiesenfeld. Ekde tiu tempo ĉiujare je la sama dato Wiesenfeld parolas tra la pola stacio en E. En 1930 okazis la unua invito je U. K. tra radio: Wiesenfeld en la nomo de PED faris inviton al Krakovo por 1931. En 1934 la Pola Radio jam regule disaŭdigadis E-ajn prelegojn.

PED agas senĉese. Ĉiujare okazas ĝiaj konferencoj dum kongresoj tut-polaj. En 1930 la IV. kongreso okazis en Lodzo (solena malkovro de tabulo en la strato Zamenhofa, radioparolado, oficiala leĝigo de la Pola Instituto de E, fondita dum la I. Tutpola E. Kongreso en 1922 k. a.) En 1931 duafoje okazis U. K. en Krakovo. Kaj la poloj aranĝis eĉ du postkongresojn. Unu — tuj senpere post Krakovo — en Varsovio, kie okazis pilgrimo al la tombo de Z kaj malkovro de honora tabulo sur la domo kie loĝis Z ĉe strato Zamenhofa 9. La Kongresanoj el Varsovio veturis Bialystokon por ĉeesti la duan postkongreson, kie okazis la inaŭguro de belega impona monumento de Z en la ĉeesto de reprezentantoj de la loka registaro.

En 1932 la V. landa kongreso okazis en Lublin. En 1933 la VI. okazis kun la plej granda soleno en la salonoj de la Varsovia urbdomo sub honora protekto de l' prezidanto de l' Pola Ministraro.

Ĉirkaŭ 40 agemaj grupoj, kelkcent regule funkciantaj kaj multe vizitataj kursoj, oftaj prelegoj, oftaj artikoloj en la ĉiutaga gazetaro, sistemaj prelegoj tra radio, ĉio ĉi donas plenan fidon, ke la movado en P. nuntempe iras per grandaj paŝoj antaŭen. Preskaŭ ĉiuj ŝtataj kaj komunumaj registaroj estas favoraj por la movado, la socio (en ĉiuj siaj medioj) rilatas respektplene al tiu ideo, la gazetaro, ĝis nelonge obstina, nun gastame loĝigas artikolojn, ofte eĉ specialajn fakojn pri E, eĉ eldonistoj mem invitas aŭtorojn. En la Varsovia ŝtata blindul-instituto E estas enkondukita oficiale kaj devige por ĉiuj lernantoj de la vesperaj kursoj. En 1932 la Instituto akiris la unuan elektran

Braillepresejon kaj la unua de ĝi eldonita verko estas lernolibro de E.

Societoj. P E Delegitaro (PED), reprezentanto de ĉiuj E societoj en P. Ĝi kreigis en 1926 post longaj kaj nesukcesintaj provoj. Ĝis nun PED sukcesplene funkcias kaj akiris prestiĝon en P. Ĉiujare ĝi organizas landajn kongresojn kun komitataj konferencoj. Ĝiaj organoj estas: Ekzekutiva Komitato (nuntempe en Krakovo, prez. prof. Bujwid, sekr. J. Alfus), Plena Komitato, Konferenco, kaj la revuo P E-isto, — P E Asocio, la unua organizaĵo en la historio de E en P, fondita en 1908 en Varsovio. Ĝi ne okupas la lokon de la nacia asocio, nur egalraite kun multaj aliaj polujaj societoj apartenas al la PED. Longan tempon ĝi estis la sola societo E-a en la rusa P. kaj tial eĉ pretendis je rajtoj de nacia societo. — E R o n d o K o n k o r d o, Varsovio, kies celo estas disvastigi ne nur E-n, sed ankaŭ ĝian internan ideon, fondita 18 majo 1921 laŭ instigo de Z, fondintoj: Wiesenfeld, J. Litauer, Ign. Tejchfeld. Komence Konkordo havis la taskon fariĝi movado, tiucele estis direktita propagando tra ĉiuj landoj de Eŭropo. (En Francujo estis jam pli ol 20 grupoj.) Okazis dum la U. K. en Vieno kaj Ĝenevo int. fakaj kunsidoj iafafoje kune kun la pacifistoj. Laste ĝi limigis sian laboron je loka grundo kaj estas unu el la plej agemaj grupoj. — L a b o r o, lab. E-ista Asocio, unu el la plej ĉefaj klasbatalaj societoj en P. fondita en 1919. Ekzistas 12 filioj. kun centrejo en Varsovio. Ĝi apartenas, kiel ĉiuj aliaj societoj, al PED. — P I n s t i t u t o d e E. Ĝi komencis sian vivon kiel provizora instituto antaŭ la I. Tutpola E Kongreso en 1922 en Varsovio. La kongreso (3-5 jun.) oficialigis ĝin kaj elektis kiel unuan gvidanton Wiesenfeld, kiu gvidis ĝin dum multaj jaroj (aranĝis ekzamenojn, paroladojn, radioprelegojn ktp.) En 1930 la Instituto estis registrita ĉe la registaro kaj ĝia centro estis transloĝigita Krakovon. La Instituto estis sisteme registrita kiel nacia filio de la Int. Instituto de E.

La Pola Literaturo estas jam de la komenco multe reprezentita.

La nomo de Orzeszko famigis Z per la traduko de »Marta«. Grabowski liveris al la E-istaro tre multe da polaj juveloj, el kiuj ni citu: »S-ro Tadeo« de Mickiewicz, »Pekoj de l' Infaneco« de B. Prus, »Mazepa« de J. Slowacki, »Halka« (unua opero en E) de Wolski, »En Svisujo« kaj »Patro de Pestuloj« de J. Slowacki, »Consilium Facultatis« de J. Al. Fredro, Leono Zamenhof liveris al ni: »Aspazio« de Swietochowski, »Protesilas kaj Laodamia« de Wyspianski, verkojn de Reymont ktp. Kabe: »Faraono« de Prus, »Fundo de Mizero« de W. Sieroszewski, »La Interrompita Kanto« de M. Konopnicka k. a. Aliaj verkoj: »La Neĝo« de Przybyzowski (trad. Ficowski), »Si — La Tri« de Sienkiewicz (Grabowski), »Ni Sekvu Lin« de Sienkiewicz (Kuhl), »Quo Vadis« de Sienkiewicz. (trad. Lidja Zamenhof). Et aliaj polaj aŭtoroj konataj estas en E: Balucki (trad. Ender kaj Grenkamp), Belmont (mem E-isto), Zeromski k. a. Nuntempaj polaj aŭtoroj: Tuwim (mem E-isto), Wittlin (trad. Wiesenfeld), Rzewski (trad. Domostawski) k. a. Poloj laborantaj ageme sur la lit. kampo de E: Zamenhofoj (Lud., Leono, Felikso, Lidja), Grabowski, Kabe, Zakrzewski, Brzostowski, Bujwid, Kuhl, Wiesenfeld, Dratwer, Dreher, Grenkamp, Alfus, Zawada. Originalaj verkistoj: Forge, Belmont, Karolczyk, Lejzerowicz, Sapiro k. a. Sciencaj verkoj: »Kvin prelegoj pri bakterioj« (de prof. Bujwid), »Estetiko en Medicino« (K. Swiecicki) k. a. Kolektverko: Antaŭen Kun Kredo (eid. »Pola E-isto«, 1912).

Aldono. Apartajn biografiojn de ĉ. 60 polaj E-istoj oni trovas sub la litero de ĉiu meritulo. Ne ĉiuj tamen estas tie troveblaj pro diversaj kaŭzoj (manko de loko aŭ materialo, ktp.). Ĉi-loke ni mencias kelkajn nomojn de agemaj aŭ verkemaj pioniroj polaj. Ili estas (aŭ estis): d-ro Chybczynski (red. de »La Kuracisto«), St. Czarnowski (vortaro kaj lernolibro), Kaz. Domoslowski, d-ro I. Dubrowicz, d-ro J. Geliebter el Zamoŝĉ, M. Guterman (vortaro), f-ino Emilja Hermelin (nevino de Z), F. Hiller (aŭtoro de E-a opereto), Jurysta, d-ro Karlsbad, J.

Kaszycki (Krakovo), M. Kaus, J. Kostecki (L. K.), Cz. Kozłowski (»Petaloj«), L. Krysta, A. Lipski, F. Lotto, O. Kuzma, Maske (po'lo eksterlande), J. Mikulski (artisto drama), d-ro P. Muszkatblat, d-ro A. Naumann, s-ino H. Neuberger (Krakovo), Pankratz (membro de la pola parlamento), Rudnicki, E. Ryttenberg (blinduloj), R. Rybczynski (lernolibro), H. Schnützer, W. Skalski (lernolibro), d-ro Sochacki el Deblin, A. Stankiewicz, prof. Świecimski (dir. de gimnazio, kiun li disponis por la Pola E-Societo), prof. M. Sygnarski (lernolibro), St. Szabuniewicz el Moskvo, N. Szapiro (agema eldonisto e-a), Br. Szczepankiewicz, S. Szyk el Wilno, M. Trochimowski, J. Tuwim (plej fama nuntempa pola poeto), d-ro Wajsbłum, K. Wasilewski, L. Wiener (lernolibro), d-ro Wizel, Al. Zambrzycki (red. de »La Farmaciisto«) kaj K. Zajaczkowski.

Noto. Specialajn dankojn meritas pro grava helpo aŭ kunlaboro:

- S-o J. Alfus (Krakovo)
- » W. Pfeiffer (Lodzo)
- » Dr W. Róbin (Varsovio)
- » Dr Sofio Zamenhof (Varsovio)
- » Dr Felikso Zamenhof †
- F-ino G. Spiess (Dancigo)
- » G. Berg (Stokholmo)
- S-o H. Fischbach (Drahovice)
- » G. Vermandere (Antverpeno)
- » R. Kreuz (Genevo)
- F-ino E. Pastein (Varsovio)
- » H. Edelbaum (Varsovio)

E. WIESENFELD.

Pontz (ponc) Josef, germano, d-ro jura, notaria kandidato en Jablonec a. N. (Gablonz, Ĉeĥosl.) Nask. 5 jul. 1895 en Haslau apud Aŝ. E-isto de 1909. Aktive kunlaboris en la landa organizo, prezidis GEL.

Popov Hristo, bulgaro, instr. en vilaĝo Dolna Orjaĥovica. Nask. 17 apr. 1870 en D. O. Aktivulo de ĉ. 1897. Lernolibro, artikoloj, paroladoj.

Populara Esperanto-Biblioteko estas fondita en Amsterdam 1933 de neesperantistoj. Ĝi celis doni ĉiumonate bonan romanon malkare al abonantoj. Ĝi aperigis kvin numerojn, kaj poste ĉesigis la eldonon.

Por Recenzo. Novelo, originale de Sturmer. 1930, 61 p. »Brila pruvo

pri la mozaikarta talento de la aŭtoro. Li estas nia plej hodiaŭa verkisto, kiun amuzas la akvoguto, ĉar en ĝi oni ludas la dramon de la mondhistorio. La lingvo estas moderna, kuraĝa.» (Szilágyi, L. M., 1931, p: 49.)

Porto Carreiro Neto (portu karejru netu), Luiz de Costa, brazilano, d-ro, ing., docento kaj asistanto ĉe la Politeknika Lernejo de Rio de J. Ĝen. sekr. de BLE kaj vicprez. de BKE, vicĉefdel. de UEA. Poeto kaj prozverkisto, du trad. romanoj en manuskripto. Kunredaktas kompletan P-E Vortaron.

Portugalujo. La unua portugalo, trovebla en la E dokumentaro, estas d-ro Costa e Almeida, kiu estis ano de la unua juĝanta komitato en 1895 kaj multjarposte la unua LK-ano. La movado gutgute pligrandiĝis en Porto, kiam la unua lernolibro aperis duonverkita de Heinlein Ferreira (1896). En Porto J. A. Proenca kaj en Lisboa Rudolf Horner paroladis (unue 8 jan. 1907) kaj kursgvidis unue sindonante kore al la movado. Jen la unuaj estraroj de la unuaj grupoj (1909): Porta Grupo E-ista: hon. prez. H. F. Höveler (Ĉefeĉ), prez. Fernando Proenca, sekr. Madeira, Kas. Teixeira, dir. Ferreira da Silva, Freitas Veloso, Moreira da Silva kaj Manuel Cunha. Lisbona Grupo E-ista: prez. Bandeira de Melo, vicprez. Horner, 1-a sekr. Luzo Bemaldo, 2-a sekr. Oliveira Coelho, kas. Pereira da Silva. Samjare en apr. aperis la unua n-ro de la unua P E-R e-vuo, kies unua gvidanto estis Proenca. La unuan duonoficialan favoron prezentis P Societo de Ruĝa Kruco kun la eldono de 10.000 E-gvidiloj, disdonitaj senpage al la sanigserva oficistaro kaj al la membroj de la societo (1912). La akcepto de E kiel lingvo permesata de la promilita cenzuro (1916) estis la unua oficiala venko; cenzuristo Kap. Acacio Lobo. En »Lisbona Verda Stelo« la unua laborista E spertulo Costa Junior starigis por la LVS la unuan laboristan E Asocion (1917). Samjare Saldanha Carreira ricevis permeson oficialan de la Militministro kunporti la E distingilon; en la mondo li estis la unua oficiro kun tia permeso. La

prez. de la P Respubliko d-ro Sidonio Pais persone ĉeestis gravan feston en la Nacia Teatro je honoro de Z (1918). Aperis en la registara tagjurnalo 8 aŭg. 1919 la unua oficiala permeso al senpage kurso de E en komerca lernejo. La oficialaj rezultatoj estas enskribitaj en la granda registrolibro de la ĝeneralaj ekzamenoj, kiuj okazis sub la prezido de d-ro Antunes Coimbra, direktoro de la lernejo Ferreira Borges kaj gvidataj de Luzo Bemaldo (eminenta E pioniro) kaj de la prof. de la kurso, Saldanha Carreira.

En la unua periodo de la movado Proenca, Horner kaj Bemaldo estis la sana cerbo de la movado; Godofredo, d-ro Costa Esteves, Acacio Lobo, Eduardo Moreira iliaj viglaj helpantoj. Iliaj nomoj aperis ĉiam tra kursoj, paroladoj kaj artikoloj. Multaj efemeraj grupoj starigis kiel multaj kursoj en metropolaj kaj koloniaj urboj. Kiam okazis la registarsaĝo en P en 1910, E servis por detruiri neverajn noticojn dissendatajn eksterlanden de la malamikoj de la nova reĝimo. En 1916 la movado ĝuis gravan favoron de ĉiutaga ĵurnalo »Jornal do Comércio e das Colónias«, kiu malfermis rubrikon sur la unua paĝo sub titolo: Oficiala Fako de la Komitato »Por E en la Komercio«. La komitato estrata de Bemaldo redaktis pli ol kvindek artikolojn. Pro sia agado meritas specialan menciion Lisbona E-Societo, en kiu sindone laboris Adelino de Carvalho kaj Etelvina Silva. La laboristoj tra Lisbona Verda Stelo kaj la Vero eldonis 6 n-rojn de la gazeto »Laboro« kaj poste 12 de »La Vero«. En 1924 la societo »Rondo Amikeco« kaj aliaj fondis la PE-Asocion, kiu nacia societo laboris vigle en la sidejo de framasona lernejo, ĝis kiam militistaj diktatoroj ĝin okupis. De tiam PEA vivas kvaŝi nur en postkesto 279 Lisboa, en la espero de pli favoraj kondiĉoj. Saldanha Carreira oficiale gvidis kurson ĉe la Polico. La policistoj uzis kaj uzas E distingilon kaj iliaj turismaj servoj estis kaj estas oficiale uzataj de la ĉefdelegito de la P Teritorio de UEA laŭnecese. Post fermo de la unua kurso la kursanoj malfermis as-

ocion PE Polica Asocio, bele meblitan de la ĉefkomandanto. Dum 1925 aperis 6 n-roj de la oficiala organo de PEA ĉefe per la donaco de Teixeira Lino-Fundao (Esk. 12.000 \$ 00). Dum 1927—30 la movado dormadis, nur la laboristaj E-istoj dŭrigis konstante kaj senlace la propagandon, kiu eĉ nun estas tre vigla. Registrindaj nomoj: Costa Junior, Irundo Barros, Vicente Junior kaj Armando d' Almeida. La ĉefaj nunaj laboristaj asocioj estas: Ligo de l' Okcidentaj E-istoj, Antaŭen kaj Nova Vojo.

En 1932 la movado reviviĝis post parolado kaj kurso gvidita de Saldanha Carreira antaŭ la mikrofono de la Radio Stacio CT. 1AA Lisboa de Abilio Nunes dos Santos. La instruo estis vera apostolado, la paroladanto profitis ĉiam la korespondadojn elvenantajn el la Asocio de Blinduloj, el la Malliberejoj ktp., por sin turni al ĉiuj, kiuj bezonis protekton kaj komforton kaj beni ilin per ripozigaj, mildigaj vortoj. Kiel sekvo, la unua kongreso de Radiotelefonio (1932) aprobis ĉiesvoĉe tezon prezentatan de radioamantoj de Barreiro, aklande apogante la decidojn de Kongreso de Radio-Klubo okazinta en Cannes. La konkludoj de la unua Nacia Kongreso, por ke E estu akceptata kiel lingvo de la Radiotelefonio estas prezentitaj oficiale al la ministro.

En 1933 fondiĝis E-ista sekcio en »Touring Club de Portugal«. Pere de ĝia agado oni sukcesis aranĝi duonoficialan nedevigan E-kurson en la komercaj lernejoj de Ferreira Borges, Veiga Beirao, Rodrigues Sampaio; oficialan nedevigan kurson ĉe la polico; kaj kurson en Touring Club, kies vicprez., la fama verkisto D. Alberto Bramao prezidis ĉiujn kunvenojn kaj paroladojn organizitajn de la sekcio.

SALDANHA CARREIRA

Postnikov A., ruso, kapitano de rusa gvardio. Aristokrato, kavaliro de multaj ordenoj pro partopreno en 28 bataloj dum la japana milito. Energia prop-isto de E. En 1909 li fondis Ruslandan Ligon E-an, revivigis la gazeton »Ruslanda E-isto«. En 1910 li organizis la 1-an rusan E-kongreson. Sed li uzis E-n »ankaŭ por la malhonora kontraŭregna agado« (laŭ

esprimoj de Ŝirjaev) kaj tio kaŭzis al la plua E-movado en Rusujo tre senteban ekbaton. En 1911 li estis arestata kaj aljuĝata al degrado de la rangoj, senigata je la ordenoj kaj klasrajtoj kaj kondamnata al 8-jara punlaborado. La Ligo kun siaj filioj estis fermata de la registaro. S.

Postnikov Feodor A. (ps. F. A. Post), ruso, nun usonano, kozaka oficiro, poste milita ing. en Ruslando ĝis 1905, ing. kaj termezuristo en Usono. Nask. 29 febr. 1872 en Kovno-Kaunas. Prez. de la unua oficiala E-Asocio »Espero«, Petrograd. 1897—99, prez. de Vladivostoka Grupo, 1902—05, konstruisto de unua E-a (?) Balono »Espero« dum rusa-japana milito. Akcelanto de E en Japanujo pere de prof. Hasegavo. Organizanto de la unua E-a rondo en Kalifornio, Berkeley, 1907, prez. de la tiea grupo kaj ĝia kursgvidanto dum multaj jaroj. Multaj artikoloj en la unuaj E-revuoj »La E-isto«; LI ktp., eldonisto de »Pacifika Espero«, 1915, 1925—28.

Poŝto, v. PTT.

Poŝtstampoj. Dum la UK-j la poŝtoj de la koncernaj landoj lokigas en la Kongresejoj poŝt-oficejon, en kiu la poŝtajoj, elirantaj (el tiu oficejo) estas stampataj per speciala stampilo kun teksto dediĉita al la Kongreso.

La unua poŝtstampo kun teksto E-a okazis dum la IX. UK en Bern (Svisujo) 1913. Ĝia aspekto: rondo, de radio 14 mm-a; interne de ĝi — dua rondo samcentra de radio 8 mm-a. En la spaco (zono) inter la du rondoj troviĝis (rond-ire) la jena teksto: »IX. Universala Kongreso de Esperanto Bern«. En la interna rondo iras tra la mezo, horizontale du paraleloj, inter kiuj estas spaco de 9 mm kaj troviĝas jena teksto: 24. VIII 13—3. Super tiuj paraleloj, en la segmento, formiĝinta de la supera paralelo kun la interna rondo, ĝuste en la mezo troviĝas E-a stelo, ĉirkaŭita de malgranda rondeto, kiu tuŝas: supre — la internan rondon kaj malsupre — la mezon de la supera paralelo. Ambaŭflanke de tiu stelo (en la supra segmento) troviĝas po kvin vertikalaj malkreskantaj linietoj. En la malsupra segmento (t. e. en la spaco tormi-

ĝinta de la malsupra paralelo kun la malsupra parto de la interna rondo) ankaŭ ĝuste en la mezo troviĝas sama rondeto, sed en ĝi — la svisa blazono (kruco paralel-linia, aŭ, kiel oni nomas en la tipograf-arto: »neon« linia) kaj ambaŭflanke de tiu blazono samaj vertikalaj linioj (kiel en la supra segmento).

La sekvantan jaron, en 1914 la Pariza Kongreso ankaŭ havis Kongresstampon, sed en franca lingvo. Rondo de radio 13½ mm (nur unu) kaj en ĝi rondtekte: »10-e Congrès Int. Esperanto« (kaj alidirekte, sed ankaŭ rond-ire): Paris. En la mezo de la stampo — tri linioj horizontalaj, en la unua — steleto; en la dua — 2—8 kaj en la tria — 14.

La XI kaj la XII ŝajne ne havis Kongresstampon.

La XIII (1921) -havis, la XIV ĝis la XVII (Genevo 1925) ankaŭ havis. La XVIII — ĉu havis — mi ne aŭdis (ŝajne — ne).

La XIX ĝis XXII (Oxford 1930) havis E-tekstajn.

La XXIII kaj la XXIV havis kun nacilingvaj tekstoj.

XXV (jubilea) en Köln — ne havis Kongresstampon.

E. WIESENFELD.

Potapĉik Nikolaj Stepanoviĉ, ukrainano, sovetiano, laboristo. Nask. 1903. E-isto de 1929. Estro de la kultur-sektoro de Ukraina Intersindikata Konsilantaro, ĝenerala sekr. de Ukraina komitato de SEU en Ĥarkov. Kompilis kaj redaktis kolekton da artikoloj pri socialisma konstruado en USSR »La paŝoj de Jarkvino«, 1932.

Pouchot (puŝo) Georges, franco, prof. Nask. 20 sept. 1880 en Caluire (apud Lyon). Sekr. fondinto de »Amikaro E-ista de Lyon« (1904), sekr. de la Rodana Federacio. Adm. de SFPE. De 1905 gvidis multajn kursojn, publikajn kaj oficialajn (urbajn aŭ lerneĵajn) kaj per radio (TSF).

Pragano Sigismundo, rumano, advokato en Bucureŝti. Nask. 5 jan. 1907 en B. Prop-isto de la E-istiĝo en 1923, partoprenis de la landan movadon, gvidis kursojn, eldonis la rumanan ŝlosilon. De 1931 funkciis kiel Cseh-metoda instruisto en Nederlan-

do kaj Anglujo. Tradukis el la rumana literaturo por diversaj E-gazetoj. Aperigis en 1928 la libron de E. Relgis: »La humanitaristaj principoj kaj la Internacio de la Intelektuloj« kaj trad. en 1932 (kun P. Firu) la verkon »Rumana Bonhumoro« en elektitaj rakontoj, kiu ricevis rekonon kaj monan subvencion de la rumana registaro.

Praha. Ĉefurbo de Ĉeĥoslovakujo; 848.000 loĝantoj. — 13-a UK 31 jul. — 6 aŭg. 1921; 2561 kongresanoj el 35 landoj. Grava oficiala simpatio. Decido pri centra organizo de la E-movado. — Samtempe 1-3 aŭg. okazis la fondo kaj 1-a kongreso de SAT. Honorprez. H. Barbusse. Oni malakceptis la neŭtralecan starpunkton. — Int. Konferenco Paco per Lernejo 16—20 apr. 1927, kunvokita de la Int. Eduka Oficejo el Genève. E kiel nura traduka lingvo. — 14-a Int. Katolika E-Kongreso en 1929 en la kadro de la miljarfestoj de s-ta Vencslav; 211 kongresanoj el 16 landoj.

Pratdesaba Josep, kataluno, astronomo, (posedas gravan privatan observatorion). Nask. 6 aŭg. 1870 en Vic. E-isto de 1906. Fond. kaj estis prez. de l' loka EG; prop-isto ĉe sciencaj medioj.

Preĝlibroj (katolikaj). La unuan kat. preĝlibron verkis Beaufront, (1893, 46 p., dua eld. 1902, 65 p.), kiu en 1906 prezentis ĝin al Papo Pio X-a. Pluaj preĝlibroj: »Katolika preĝaro«, (v.) eldono de Espero Katolika, 180 p. 1907. — »Spirita Juvelaro«, 1910, 292 p. trad. el la nederlanda P. P. Pastro, 1910, 292 p. — »Migru kun mi«, (v.) el la germana trad. Clemente, 1913, 336 p. — »Kat. Preĝlibro«, (v.) de Carolfi, 1922, 160 p. — E-a Preĝareto por katolikoj dum int. kunvenoj, 1924, 36 p. — »Kat. Preĝareto«, 1929, 32 p. — »Preĝareto« de Carolfi, 1931, 48 p. — Frato W. van ZON.

Preĝo sub la verda standardo. Poemo de Z, kiun li verkis en 1905 okaze de la 1-a UK kaj deklamis en la fino de sia kongresparolajo. »... el ĉiuj poemoj de Z estigas la plej ampleksan sentadon... Estas pulsado de la tuta mondo, kiu donas vivon al ĉi tiu poemo, kaj la koloron de l'

vivo.« (Artikolo de Behrendt en »Kongresa Jubilea Libro«, 1933.)

Preller Frans Jozeph, nederlandano, katolika sacerdoto kaj dominikana pastro. Nask. 18 marto 1885 en Arnhem. E-isto de 1907. Starigis kun J. P. L. Nieten grupon en Nijmegen en 1909, helpis fondi NKEL, kies estrarano li estis dum multaj jaroj. Farris prop. prelegojn kaj verkis multnombrajn artikolojn. Kunlaboris al »Ned. Katoliko«.

Pregel Francis August, verkisto astrologia en Bydgoszcz, Polujo. Nask. 26 jun. 1899 en Chicago, Usono. Teatro- kaj muzikkritikilo. Ĉiujare eldonas almanakon pri kosmaj influoj. Fervora prop-isto, gvidanto de la E-movado en B. Arangas ofte prelegojn kaj kursojn. Dum multaj jaroj gvidis agentejon »P. E-Servo«. Estis la iniciatinto de l' unuigo de ĉiuj polaj ES-j.

Presa Societo Esperantista. Fondita en Paris en 1904 por la presado kaj eldonado de E-aj gazetoj kaj libroj. Ĝi estis la unua pure E-ista entrepreno. Prez. de la administracio estis prof. Th. Cart, komerca dir. d ro P. Fruictier, teknika dir. P. Lengyel. Inter la gazetoj de ĝi eldonitaj la plej grava estis la LI, kies red. Cart, ĉiam energie batalis por la Fundamento. Dank' al tiuj gazetoj kaj al la multnombraj nur purstilaj libroj, kiujn ĝi eldonis, la ŝanĝemuloj de E estis venkitaj. Post la milito tiu societo devis ĉesigi sian ekzistadon kaj tute malaperis. Sed jam de 1908 la akciuloj de la societo decidis vendi la presejon al ĝia laborestro Viktoro Polgár kaj konservis nur la librejneldonejon. Laŭ I. POLGÁR.

Preter la Vivo. Poemaro de Baghy. 1922, 128 p., dua eld. 1931. »En nia int. poezio ĝi estas nova venko, nova atingita ŝtupo kaj samtempe nova elira punkto por la estontaj formoj kaj serĉadoj. La tuta libro spiras per la plej alta kaj pura romantikismo kun aldono de la vagabonda estetiko.« (Skito, L. M, 1923, p: 98.)

Pri Esperanto. De C. Aymonier, el la franca trad. R. Ferrer. 1913, 68 p. »Diskutado pri kelkaj ŝanĝoj de ldo proponitaj.«

Pri la origino de l' homo. De Keith, el la angla trad. Brown kaj Cormick. 1928, 64 p. »Riĉa je intereseĝaj faktoj, je pripensigaj deduktoj.« (G. S., 'E', 1928, p: 176.)

Pri l' Moderna Arto. De Jan Brzeczowski kaj S. Grenkamp. 1934, 32 teksto- kaj 68 klišopaĝoj. »Ĝi alportas multe pri la novaj »ismoj« de la pentroarto kaj en densa, drasta formo plej taŭge konigas ĉion, kion estas necese scii pri la diversaj tendencoj.« (G. Avril, »Lingvo Libro, 1934, p: 29.)

Primmer John Boyd, skoto, kuracisto. Nask. 30 marto 1877 en Townhill, Dunfermline. Dramverkisto. Prez. de Skota EF, 1918; kontribuanto al »Int. Medicina Revuo.«

Princo Serebrjanij. Historia romano de Alekseo Tolstoj, el la rusa trad. M. Sidlovskaja, 1912, 286 p. »Ĝi prezentas al mi la strangan caron, ... kiam li fortege premas la bojarojn per la nove kreita korpuso de la »opriĉnikoj«. La tradukistino skribis laŭ tre perfekta E-a stilo.« (»La Revuo,« VII-a vol., p: 142.)

Printempo en la aŭtuno. Rakonto pri dolĉe melankolia renkonto. Originala romaneto de Baghy. 1931, 114 p. Aperis ankaŭ en hungara traduko. »Tiu idilio inter studento kaj filino de foirarlekenoj havas freŝecon, koloron, naivecon ĉarmajn.« (G. S., 'E', 1931, p: 145.)

Pri Piedpilkludanto. Rakonto de V. v. Nispen, el la nederlanda trad. M. Bartholomeus. 1934, 96 p., kun ilustraĵoj. Malmultaj okazajoj, religi-morala tendenco.

Privat (priva) Edmond, franclingva sviso, d-ro pri historio, docento ĉe la Geneva Univ., verkisto, kunlaboranto de naciaj gazetoj. Nask. 17 aŭg. 1889 en Genève. Jam dum la infanjaraj li lernis E-n, en 1903. fondis kun Hodler la gazeton Juna E-isto. En 1905, kiel 16 jara junulo partoprenis la unuan kongreson en Boulogne sur Mer, kien li piede pilgrimis kaj kie kun matura elokventeco parolis. P. en la Pariza universitato studis lingvosciencan kaj historion kaj meritis specialan atenton liaj libroj franclingvaj pri Historio kaj Psikologio de Popoloj. P. prezidis int.

komitatojn kaj konferencojn por la liberigo de subpremitaj nacioj. Dum 1922—26 honora konsilanto kaj vicdelegito de Persujo. Pioniro de la popolklerigo kaj de la kooperativa sistemo en Svislando. Tiu meritplena vivo estas organisme traplektita de E rilatoj. En 1907—08 faris longajn propagandvojaĝojn tra Usono, Anglujo kaj Francujo, en 1911 en Ruslando kaj Mez-Eŭropo. De 1920 ĝis 1934 li redaktis *Esperanton*, kie konstante aperis liaj klarvidaj, elegantstilaj artikoloj. De 1921—1928 li reorganizis kaj gvidis la int. movadon. En 1923 prez. de ICK, 1925 prez. de UEA, prez. de Svisa Societo E. Lia propagandista agado distingiĝas per la absoluta seriozeco kaj kompetenteco. Li prezentis E-n al Ligo de Nacioj, al la Int. Laboroficejo kaj Univ. Telegrafa Unuiĝo, aranĝis int. konferencojn teknikajn en E (Edukistoj — Genève 1922, komercistoj — Venezia 1923, Radio — Genève, 1924, Paco per lernejoj — Praha 1927, Unua Somera Universitato, Genève 1926.) Kiel oratoro estas unu el la plej eminentaj, klara kristale pura elparolo kaj komprenebla logika facila pensperado. Ankaŭ lia pedagogia agado meritas laŭdon. En 1908 aperis liaj »E at a glance« kaj en la sama jaro »E in 50 lessons«, en 1910 »Karlo«, kiu ankaŭ nun estas populara legolibro. En 1911 aperis la same populara rektmetoda kaj bonega »Kursa Lernolibro« kaj ĉe tiu fako ni mencias lian E lingvistan ĉefverkon »Esprimo de Sentoj en E«. Pli science, pli klare kaj pli ĝueble oni ne povas pritrakti teoriajn problemojn, kiel ili aperas en la prezentado de P. en tiu ĉi libreto. Li estas la plej grava historiisto de la juna E movado. El lia »Historio de E«, (Unua Parto 1911, Dua Parto 1927) kaj el la »Vivo de Z« (1920) ni havas la plej detalan kaj samtempe poezian rakonton de historio de E. Krom tiuj aperis lia traktato »Pri E literaturo« (1911), verketo kun la samaj kvalitoj. La talento de P. produktis ankaŭ beletristajn verkojn, la versan dramo-legendon »Ginevra« (1913), kaj »Tra l' Silento«, en ili mildvoĉa, delikatsenta poeto prezentas sin. Liaj

ĉiuspecaj verkoj respegulas el stila vidpunkto kristalan, puritanan klarecon, elegantecon kaj en la historiaj kaj beletristaj verkoj tiu stilo atingas la plej altajn regionojn de la E literaturo. Ĉu la stilo, ĉu la diritajoj sentigas al ni, ke la verkisto de sia juneco vivas en la E-ista vivo, lia individuo estas ne disigebla de la E-ista agado kaj tiu sento kaj kredo — logika kredo de klerulo — floras en liaj verkoj sub la literoj, kiuj neniam estas mortintaj aĵoj por P. Kion ajn li verkas, la frazoj vivas, ni rekonas ĉiujn kolorojn de la vera vivo kaj lia verkista agado jam en frua epoko de la E movado influis la junan generacion por liberiĝi de la paper-odora, seka literatura tendenco. Kaj ankaŭ sur aliaj kampoj same favore li influis siajn kunlaborantojn kaj la E-istaron. F. SZILÁGYI.

Procházka (prohaska) Kare', ĉeĥo, landa konsilanto en pens., loĝas en Praha. Nask. 1 okt. 1880 en Nemecky Brod. De 1906—14 prop. paroladoj en Praha kaj en provincaj urboj, instruado. Antaŭ la milito komitatano kaj vicprez. de EK en Praha kaj de BUE. Ekzamena komisionano. Post la milito kunreorganizinto de C. AE. Komitatano de ĈEI. Verkis Ĉ-E vortaron, (25.000 vortoj), kunverkis sisteman lernolibron, kunlaboris je gazetoj, kuntradukis ĉeĥan romanon »Avinjo« de B. Němcová.

Programo de Komunista Internacio. El la rusa trad. G. Filipov kaj A. Šissler, 1930, 119 p. »Plej aktuala dokumento de Komintern. Ĝi montras al ni la spiritostaton, en kiu troviĝas la anoj de la komunistaj partioj. La lingvo kelkloke estas tre peza.« (Jonas, »La Socialisto«, 1930, p: 80.)

Pro Iŝtar. Romano, originale de Luyken. 1924, 304 p. Temo el la antikva Babela historio. »La bildoj senĉese alternas, fariĝas ĉiam pli interesaj, pentrindaj. La romano, kiel granda filmo, aperigas antaŭ ni la okazintaĵojn tute vivoplenaj. Ĝi estas garnita per historiaj aŭtentikaĵoj.« (Jobo, L. M. 1924, p: 200.)

Pro k'o? Kriminal-romano originale de Argus (ps. de F. Ellersiek). 1920, 158 p. »Vera policromano. Te-

mas ne nur pri terura krimo kaj lerta trovado de l' krimulo tra diversaj aventuroj kaj landoj, sed ankaŭ pri amnaskiĝo kaj ĝia evoluo al edziĝo inter la ĉefpersonoj. La verkisto mirinde uzas nian lingvan riĉecon.» (G. S. „E“, 1921, p. 55.)

Proleta Esperantistaro. Internacio de Proleta Esp-istaro (IPE) fondiĝis en 1932 rezulte de grava skismo en mezo de SAT, kiu estis ĝis tiam unueca mondorganizaĵo de ĉiuj proletaj E-istoj (v. SAT, Laborista movado). Pro sia speciala »sennacieca« ideologio kaj gvidado, SAT jam en la unua tempo de sia ekzistado malkontentigis multajn prol. E-istojn. Ankorau en 1922—1923 la ideaj kaj organizaj principoj de SAT estis forte kritikitaj el la flanko de SEU, kiu eĉ eldonis specialan deklaron pri tio titolitan »Nia pozicio«. Tamen ĉe la 3-a kongreso de SAT en Kassel 1923 estis atingita interkonsento kaj dum la pluaj kvin jaroj SAT kaj SEU harmonie kunlaboris en plena konkordo. Tiuj ĉi jaroj estis la plej progresaj jaroj de SAT-movado.

De post la jaro 1927, kiam la direkto de SAT en Parizo komencis pli insiste propagandi en SAT-gazeto la ideologion de sennaciismo en ties malproksimen evoluiginta formo, denove komenciĝis en SAT forta kritikado kontraŭ tiu tendenco. Grandan skandalon elvokis nova broŝuro de Lanti »Laborista Esp-ismo«, kiu estis eldonita kiel kvazaŭa programo de SAT kaj kiu enhavis diversajn asertojn ne akcepteblajn laŭ la marksisma vidpunkto. Ĉefe la kritikoj devenis el la flanko de SEU-anoj.

Por repuŝi tiujn kritikojn, la direkto de SAT en Parizo entreprenis fortan atakon kontraŭ SEU kaj precepte kontraŭ ties ĝenerala sekretario Dizen. Utiliginte la malfacilajn kondiĉojn de montranspagado el Sovetunio al aliaj landoj, la direkto akuzis SEU pri »intenco« retenado de la mono por malutili al SAT. Kaj kiam la opozicio decidis eldoni gazeton por kontraŭbatali, la direkto eksigis el SAT Dizen kaj multajn aliajn opoziciulojn, sovetaĵojn kaj alilandajn.

La konflikto atingis apogeon en okt. 1930. En Berlino fondiĝis Orga-

niza oficejo de klasbatala SAT-opozicio, kiu entreprenis eldonadon de la gazeto »Internaciisto« responde al »Sennaciulo«. En Leipzig komencis laboron nova sendependa e'donejo de revolucia E. literaturo »Ekrelo«. Kontraŭ la alte leviginta opozicia ondo la direkto de SAT asekuris sin per enkonduko de nova regulo ebliganta voĉdonrajton en SAT nur al la plenjarabonantoj de »Sennaciulo«. Tiamaniere estis senrajtigita granda plimulto da SAT-anoj. Por ricevi aprobon al sia konduto, la direkto aranĝis voĉdonadon, en kiu partoprenis nur ĉirkaŭ 600 personoj. Responde al tiu ĉi direkcia voĉdonado, la opozicio organizis en marto 1931 alian ĝeneralan voĉdonadon inter ĉiuj SAT-anoj senescepte: el 1256 voĉdonintoj el 30 landoj 1218 voĉdonis malfidon al la direkto (sume, kun subskribintoj de kolektivaj rezolucioj, entute 2700 SAT-anoj esprimis malfidon al la direkto).

Ĉe la vica SAT-kongreso en Amsterdam en aŭg. 1931 la opozicia anaro aranĝis propran kongreseton, kiu decidis anstataŭ la organiza oficejo fondi Int. Unuigan Komitaton de Proleta E-Movado. Krom SEU, a' la opozicio plene aliĝis Germana Lab. E. Asocio, Japana Prol. E. Unio, Bulgara LEA kaj Nord-Amerika LEA (LEANA). Aliĝis ankaŭ certaj partoj de la lab. E. asocioj franca, pola, brita, sveda, nederlanda, hungara, ĉehoslovaka, finna, norvega, aŭstra, hispana k. a.

Kiam evidentiĝis la neebleco devigi la direkcion de SAT reakcepti la eksigitajn membrojn kaj tiamaniere restarigi la unuecon de proleta E-movado, la skismo realiĝis definitive. Granda nombro da membroj forlasis SAT: el 6.500 membroj en 1929 — post du jaroj en 1932 en SAT restis apenaŭ 1500.

En aŭg. 1932 en Berlino okazis 1-a fondkongreso de IPE. Ĉeestis 348 delegitoj el 12 landoj. Ĉe tiu kongreso IPE konstituiĝis kiel unuecfrota klasbatala organizaĵo de ĉiutendencaj proletaj E-istoj dezirantaj praktike labori per E. por socialismo.

La faŝista ekregio en Germanlando detruis la junan IPE-centron en Berlino. Estis ĉesigita la eldonado de

»Internaciisto«. Int. IPE-oficejo estis transportita el Berlino al Amsterdamo, Holando. Kiel organo de IPE de post julio 1933 komencis aperadi nova gazeto »Sur Posteno« en Moskvo (de post okt. 1934 ĝi aperas en Amsterdamo).

En aŭg. 1934 en Lille (Franclando) estis kunvokita int. konferenco de IPE, partoprenita de 73 delegitoj el 9 landoj. Ĝi decidis starigi int. IPE-centron en Leningrado, plifortikigante samtempe la IPE-oficejon en Amsterdamo. Samtempe la konferenco alvokis ĉiujn e-istojn al IPE, SAT, ISE k. a. partopreni la laboron de PEK (Proleta E. Korespondanto), kiu prezentas la plej bonan bazon por unuecfrota agado de ĉiuj anoj de tiuj organizaĵoj. La 2-an IPE-kongreson la konferenco de Lille decidis okazigi en Antverpeno en 1935.

Ce sia fondiĝo IPE havis 7 landajn sekciojn kaj 4 unuigajn komitatojn kun proks. 5.500 membroj. Fine de 1934 IPE havas 10 landajn sekciojn kaj 11 unuigajn komitatojn kun proks. 14.000 membroj; nome — sekcioj: SEU—8000, GLEA—2000, JEP—800, Bulg. LEA—500, Ĉinlando—400, Brita LEA—300, Japana Prolet. E. Unio—150, LEANA—100, Saarlando—100, Australazio—100; unuigaj komitatoj: Nederlando—200, Svedlando—75, Hispanlando—75, Norveglando—30, Ĉeĥoslovakio—50, Estonio—50, Latvio—50, Islando—25, Danlando—25, Greklando—15, Svislando—10 k. a. v. Laborista Movado. N. NEKRASOV.

Pro'etara Kantaro. 1924, 180 p. »La elekto de la kantoj, ilia proleta tendenco, ilia int. valoro, la fakto, ke ĉiu povas studi kaj kanti ilin dank' al la muziknotoj, faras el tiu volumo unikan verkon.« (Laŭ SAT-Jarlibro, 1929/30.)

Prologo. Jubilea kolekto de originalaj poemoj, 1918—28, de Miĥaĥi. 1929, 64 p. »Jen entuziasmo, amo, pasio, vulkaneksplozo de sentoj. La aŭtoro lertege uzas nian lingvon, kaj posedas seneraritan vesenton; laŭ ritmo, laŭ poezio, li atingas perfektecon; la lingvon li senceremonie traktas aŭ perfortas.« (G. S. E', 1929 p. 184.)

Promesoj. Kartetoj, aldonitaj al la

unuaj lernolibroj de Z, kies teksto estas la jena: »Mi subskribinto, promesas elerni la proponitan de D-ro Esperanto, lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tian saman promeson.« Subskribo. Sur la dorsa flanko: nomo, adreso. Personoj, principkontraŭaj al ideo de lingvo int., aŭ neantaj ĝian eblecon, estis petataj resendi la karteton kun subskribo: »kontraŭ«. Tiuj, kiuj estis pretaj elerni la lingvon en ĉiu okazo, sendepende de nombro de adeptoj, devis respondi per la vorto »senkondiĉe«. SİRJAŬEV.

Prononco. v. Elparolo.

Propaganda piedvojaĝo al la oka Int. E-ista Kongreso (de Paris ĝis Kraków). Originale verkita de Devjatn in. 1912, 94 p.

Protestantoj. La strukturo de la prot. eklezio tute ne estas favora al enkonduko de helplingvo, ĉar int. rilatoj preskaŭ ne ekzistas. Eĉ en la naciaj eklezioj mem estas tiel profunda malunueco, ke int. organizo ŝajne ne estas ebla. Nur en la lastaj jaroj komenciĝis int. movado, kiu ne nur celas la prot. sed ankaŭ aliajn ekleziojn: La Tutmonda Unio por int. amikeco inter la eklezioj. Prot. pastroj ofte uzis kaj fervore propagandis E-n. La unuaj inter ili certe estas Schneeberger, (Svisujo) kaj Rust, (Anglujo). En 1908 ili eldonis gazeton La Biblia Tradukisto, ties celo estis, baldaŭ kunmeti plenan tradukon de la Biblio. Pastro Ashley, (Anglujo) en 1913 komencis kolekti la E-istajn prot. ekleziulojn en speciala Ligo: »Eklezia E-ista Ligo« kaj li komencis eldoni revueton. Sed la agado baldaŭ finiĝis. En Finnlando la luterana pastro H. Pätälä, eldonis gazeton »La Kristana Espero« en 1920. Li tre fervore propagandis E-n. Ankaŭ lia laboro devis ĉesi pro manko de intereso en la ekleziaj rondoj.

Inter la neekleziaj prot. organizaĵoj estas du grandiozaj movadoj de la gejunularo. La nur-vira movado estas la Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj (Angle: Young Men's Christian Association = Y. M. C. A., germane: Christlicher Verein Junger Männer = C. V. J. M.). Laŭ la statistiko 1928

tiu ĉi organizajo kalkulis 10.034 societojn kun 1,588.000 membroj en 55 nacioj. En la centra komitato en Genevo jam en 1907 la ĝen. sekr. barono von Starck, kiu kaŭzis la ekstarigon de la KELI movado, fervore propagandis E-n. Ankaŭ liaj oficaj sekvintoj, R. Horner kaj Phildius faris tion. La societo baldaŭ eldonis kelkajn broŝuretojn en E; diversaj grandurbaj societoj komencis E-kursojn. La dua, eĉ ankoraŭ pli granda int. organizajo estas movado de prof. gejunuloj, la »Kristana Celado« (angle: The Christian Endeavour = C. E., germane: Jugendbund für Entschiedenes Christentum = E. C.), kies centro estas en Usono. Ĝi ampleksas pli ol 2 milionojn da membroj en multaj nacioj. Ankaŭ tiu ĉi organizajo en 1907 kaj 1908 propagandis E-n inter siaj anoj. Unue la usona ĵurnalo »The Christian Endeavour« regule enhavis artikolojn en E, poste ankaŭ la germana »Die Jugendhilfe« publikigis artikolojn pri kaj en la helplingvo. — La milito tre malfortigis la intereson je E en ambaŭ organizaĵoj. (v. Biblio, Diservoj, KELI, Societo de Amikoj.) P. HÜBNER.

Organizo fondita en 1913, de protestanta pastro A. J. Ashley (v.) estis la Eklezia E-Ligo. La Ligo, precipe ĝia fondinto, eldonis de 1918 ĝis 1923 propran revuon »La Eklezia Revuo«. Celo estis per E kunigi la laboron de diversaj eklezioj kaj krei laborkomunumon inter ili. La Ligo de 1923 ne plu funkcias. P. B.

Proverbaro Esperanta, aranĝis Z laŭ la verko de sia patro (Frazologio rusa-pola-franca-germana). Dua eld. 1905, 82 p. 1232 proverboj, aranĝo laŭ temoj; aboca registro.

Prozo Ridetanta. Noveloj, originale de R. Schwartz. 1928, 172 p. »La aŭtoro majstre uzas nian lingvon, kiu ĉe li estas ĉiam vivplena. Li brile sukcesas kiel humoristo kaj vortludanto. Li ĵonglas kun la vortoj, kiel ĵonglas la vivo mem.« (Akademia Raporto, 1929.)

Pruski Czeslaw, polo, magistro de juro. Nask. 1897 en Siedlce. E-iĝis en 1913 en Kronstadt (Rusujo), fondinte gimnazian E-rondeton. En multaj rusaj urboj laboris por E. Post la

milito revivigis la movadon en S. Multaj kursoj, prelegoj, aranĝaĵoj.

P. T. T. (Poŝto, telegrafo, telefono). Se iu medio nepre bezonus int. ligoecon, ĝi estus la universala organizo pri poŝto kaj telekomunikoj. Multaj malhelpoj devenas el manko de lingvo komuna, ne nur por la administraciaj rilatoj, sed ankaŭ por la uzantoj.

Jam en 1892-93 en Rusujo oni sendis senmalhelpo telegramojn en E. La administracio oficiale donis 30 dec. 1904 permeson sendi telegramon en E lande kaj eksterlande, en la kondiĉo prezenti samtempe nacilingvan tradukon.

Dum la unua UK en 1905 Dueros proponis akceptigi E-n por telegrafaj rilatoj. La poŝtisto Chavet rimarkigis ke tiu propono bezonas fakan studon, kreskado de la movado ne okazas pro oficialaj decidoj, sed kontraŭe la permeoj, akceptoj, decidoj rezultigas el la uzo mem de la lingvo.

En 1906 la »Boletin telegrafico« de Brazilo 30 nov. entenas oficialan akcepton de E, kiel klaran lingvon por telegramoj en la landa servo. Tiun gravan decidon oni ŝuldas al la deputito kaj ĵurnalisto Medeiros E. Albuquerque, prez. de la Brazila E Klubo. En 1908 la poŝtministerio de Germanujo komisiis d-ron Schwelembach, ĝen. poŝtinspektoro, ĉeesti la 4-an UK-n. Raporto favora aperas en la »Deutsche Verkehrszeitung«.

En la personaro mem jam eksentiĝas la volo grupiĝi por komuna laboro. En 1909 amerikana kolego Lisle Teewilleger skribas pri E al la ĝen. poŝtdirektoro de Usono. Tiu akceptas la proponon raporti pri la stato de la lingvo. En 1910 Paŭlo Schmidt, agema leterportisto ekinteresas plurajn personojn: kursoj estis organizataj kaj societeto »Post-E-isten Verein Z« estas starigata. En 1911 li notas, ke en multaj landoj la UEA-delegitoj estas P. T. T.-istoj. Nova fakgrupo aperas en Görlitz, la »Deutsche Post« publikas varbajn artikolojn. En Francujo la poŝtisto Ballandier prezentas deziresprimon al la 11-a Kongreso de la ĝen. Asocio de P. T. T. en Francujo, kaj ĝi estas unuanime akceptata. Ĝi petas, ke E estu akceptata por la

diversaj fakekzamenoj apud la ĉe'eraĵ lingvoj.

Schmidt (Dresden) iniciatis starigi 17 aŭg. 1911 la Int. Ligilon de P. T. T.-E-istoj (ILEPO). Unua prez. fariĝis A. Behrendt. Samtempe Ballandier kaj G. Chavet starigas P. T. T.-asociacion de Francujo kaj Kolonioj en Paris sub la prez-eco de M. di Rienzi. Samjare E-istaj kolegoj oficiale dejas ĉe la Int. Ekspozicio de Dresden. Dum la UK en Antwerpen okazas la unua int. kunveno de P. T. T.-istoj; bonaj novaĵoj el Francujo kaj ankaŭ el Rusujo, kie kursoj okazas. Sub la lerta gvidado de Behrendt la ligo vigle laboras. Int. organo Poŝtista E-isto aperas, red. Behrendt; interesaj fakstudoj. Behrendt prezentas al la »Reichspost« plenan raporton rilate al la E-movado inter P. T. T.-istoj.

La poŝtadministracio de Holando en 1913 permesas, ke la E-istaj poŝtistoj surportu la verdan stelon ĉe uniformo. La unuan fojon oni povis vidi en Belgujo en pĉeĵo de Charleroi pendindikilon »Oni parolas E-n«. Samjare la ligo informiĝis, ke d-ro Kroita gvidas kurson ĉe la faka lernejo de Tokio. En 1914 la administracio de Francujo permesas kursojn en la ĉefa poŝtejo de Paris, sed la mondmilito ĉesigas ĉion.

En 1919 kelkaj E-istaj poŝtistoj per korespondado denove prenas kontakton. En 1920 ILEPO regroupiĝas. Provizora komitato: R. Huber, Svisujo; O. Reber, Germanujo kaj Rienzi, Francujo. La franca E-ista Poŝtasocio revekiĝas; prez. Rienzi, vicprez. Dupeil. Bona artikolo en »La France Postale« de Rienzi. En Rusujo aperas unuarange nova ideo. Kvardek diversspecaj poŝtkartoj kaj kovertoj en kelkmiliona preskvanto havas tekston en E: »Poŝta Karto«, »Por Respondo«, »Kun afrankita respondo«, »Poŝto«, »Fermita letero«, ktp. ILEPO laboras pli efike. Kursoj en Berlin, Düsseldorf, Essen, Münster, Leipzig. En Brazilo Couto Fernandez daŭrigas la laboron; la estona poŝtdirekcio permesas en poŝtejoj indikilojn montrantajn la adresojn de E-grupoj. Kursoj okazas

en Finnlando, Hispanujo, Portugalujo. Persujo kaj Japanujo.

En 1921 la Int. Oficejo de la Telegrafa Unio en Bern enketas pri E per cirkuleroj apud la diversaj administracioj. Samjare en julio aperas la unua numero de »La France Postale E-iste« (Rienzi). En aŭg. okaze de la UK estas la unua kongreso de ILEPO. Nova estraro: Reber, Rienzi, Spielmann, Rippel. Laŭ la enketo de Telegrafa Unio E-istaj P. T. T.-istoj estas entute 1874 (Argentino 1, Aŭstrujo 2, Be'gujo 5, Brazilo 34, Britujo 10, Ĉeĥosl. 307, Finnlando 15, Jugoslavujo 32, Egiptujo 1, Estonujo 23, Francujo 70, Germanujo 1230, Novzelando 2, Nederlando 75, Rusujo 11, Svedujo 2, Svisujo 37, Hungarujo 1, Usono 27).

En okt. 1922 aperas en Francujo la int. fakorgano »La Interligilo de l' PTT«. Ĝin eldonas la Unueca Poŝta Federacio de Francujo. La organo estas dissendita tra la tuta mondo petante informojn pri la diversaj federacioj. Ankaŭ dum la UK-j E kaj poŝtafero interrilatas. Kolegoj dejas ĉe la ĝicetoj dum tiuj grandaj kunvenoj kaj estas uzataj specialaj stampiloj (v.). En 1923 en La Policisto aperas nova fakorgano: La Poŝtisto. La du organoj ne estas aparte aboneblaj. La kunlaboro ebligis sekve de interkonsento de Marich (red. de La Policisto) kaj Reber (red. de La Poŝtisto). La interkonsenton aprobis la samjare okazinta Liga Kunveno en Nürnberg. Ek de tiu tempo la Ligo nomiĝas ILEPTO, ĝia prez. estas Spielmann.

En 1924 la Poŝta Federacio de Francujo ĉesas subteni la eldonon de la Interligilo de l' PTT. Dum la kongreso de Wien la Interligilo fariĝas oficiala organo de la ILEPTO. Ellaboro de petskribo favore al E. Oni prezentas la petskribon al la Universala Poŝt-Unuiga Kongreso en Stockholm, tamen senrezulte. La sveda kaj URSS-a Federacioj aliĝas al la Ligo. La Ligo de la Nacioj rekomendas E-n por telegrafado kiel klaran lingvon.

En 1925 la USSR-a Poŝtadministracio eldonas la unuan poŝtmarkon en E. Kongreso de Genève.

R

Rabassa Boeras Bernardo, hispano, inĝ. dir. kaj posedanto de »Int. Institucion Luimica«, kiu de ĝia tondo 1913 uzas E-n en int. rilatoj. Nask. 15 apr. 1877 en Inca. E-isto de 1905, kunfondo de EK Palma, 1907. Kursoj.

Rác (rac) de Kövesd, Béla, d-ro, hungaro, pens. juĝisto apelacia; nun membro de la ministeria traduka oficejo kaj anstataŭanto de publika notario. Nask. 7 marto 1857 en Budapest. Instruis E-n antaŭmilite en la Universitato en Budapest kaj estis red. de »La Verda Standardo«. Estinta L. K.

Radikrimo. v. Rimo.

Radio. La unuaj disaŭdigoj en E komenciĝis en 1922. Tiam estis farataj tiaj provoj en Newark WYZ (Usono) kaj London. Pluaj E-disaŭdigoj okazis: en 1923 en Moskva (12 apr.), en Montreal kaj Rio de Janeiro; en 1924 en Praha (31 jan.), en Genève (18 marto), en Helsinkí (6 apr.), en Paris (7 apr.) ktp. La E-istoj en la tuta mondo esperis kaj klopodis atingi gravajn sukcesojn sur la nova tereno. En 1924 fondiĝis Int. Radio-Asocio por tiu ĉi celo, kiu kelkajn jarojn estis tre aktiva, ĝi eldonis eĉ Int. Radio Revuon. Poste ICK transprenis la ĉefan direkton de la radiolaboro, kreis apartan radio-komisionon. Ties gvidanto J. Jungfer eldonas Int. Radio-Servon, kiu estas unu el la plej utilaj organoj de la E-movado. Ĝi informas pri la E-disaŭdigoj, instigas kunlaboron en diversaj landoj. La komisiono mem starigas statistikon ĉiujare, kiun komunikas la oficiala dokumentaro. Laŭ tio en 1933 en 83 sendostacioj de 14 landoj okazis 1774 disaŭdigoj en aŭ pri E, inter

ili 409 kursohoroj. Detalojn v. en la laŭlandaj artikoloj; v. la indekson.

Ragnar Sven Eliis, svedo, fervojisto. Nask. 23 jan. 1909 apud Norrköping. E-isto de 1928. Sekr. de EK »La venkonta Stelo«. Kursgvidado.

Rahamägi Johannes Adolph, estono, presejestro, jurnalistino. Nask. 28 jan. 1883 en Maidla, pereis dum la mondmilito senpostsigne. La unua antaŭmilita, celkonscia organizanto de la E-movado estona, kunfondinto de la unua estona ES (Tallinn, 1907), red. de la unuaj estonaj E gazetoj »Eldonaĵoj« kaj »Estlanda E-isto« (1907—08). Verkis kaj eldonis kelkajn lernolibrojn.

Rajczy (rajci) Rezső, hungaro, d-ro, fervojfocisto. Nask. 1886 en Debrecen, mortis en 1919 en Budapest, sekve de pulmmalsano, ricevita kiel arestito pro politikaj akuzoj. Dum multaj jaroj vivigis la E movadon en Debrecen, poste laboris en Budapeŝt. Ĉe la UK en Bern gajnis la oratoran konkurson. Fervore partoprenis ankaŭ la vegetaran E movadon. Multaj artikoloj pri kaj en E, tradukoj kaj originalaj poemoj en La Verda Standardo kaj aliaj gazetoj. (l. »H. E-isto«, febr. 1920.)

Rajtigataj delegitoj. v. Organizo.

Rakontoj al mia Belulino. De Jean Bach-Sisley, el la franca trad. Touchebeuf. 1907, 135 p. Ĉarmaj legendoj, fabeloj kaj fantazioj en proza formo prezentas al ni la plej belajn trajtojn de l' homa spirito. Belega formo, fantaziplenaj pentraĵoj.« (»La Revuo«, 1907—08, p. 206.)

Rakontoj de J. Arbes, el la ĉefa trad. J. Grna. 1908, 135 p. »La traduko montras maloftan majstrecon

kaj literaturecon.« (R. A., L. I. 1908, p: 542.)

Rakontoj por Geknaboj. De Toscani, el la itala trad. Castagnini. 1932, 88 p. »Amo estas la ĉefmotivo, kiu regas en tiuj ĉi fabeloj. La traduko estas bonstila, kiel decas al libro destinata por knaboj.« (Tot-sche, L. M. 1932, p: 96.)

Rakontoj pri Feinoj. De Perrault, el la franca trad. s-ino Sarpy, korektis Z. 1904, 85 p. »Jen estas verko speciale destinata al la infanoj, sed kiun certe legos multaj maturaj personoj. S-ino Sarpy penis maturaĵ al ili tutan ĉarmon de ilia naiveco.« (»L' E-iste«, 1904, p: 182.)

Rakuša R., prof. en Maribor (Jugosl.). Trad. la slovenan rakonton de Ivan Cankar »La servisto Jernej kaj lia rajto« (aperis en »E-a Praktiko«), verkis por »Konkordo«. Komitatano de JEL.

Ramboux (ranbu) Georges, (ps. Max Roub), franco, pastro kaj ĵurnalist. Nask. 28 jul. 1887 en Reims. Direktas aŭ redaktas multajn katolikajn revuojn en Francujo, kunlaboranto de la Papa Katolika Jarlibro, ktp. De 1910 kunlaboris en la katolika E-ista movado. En 1924 dir. de »Espero Katolika«. Fondis dusemajnan gazeton »Katolika Vivo« (1931). Restarigis la francan kat. Ligon E-an (1924), kies sekr. li estis, kaj poste prez. ĝis 1932. Organizis Katolikan E Kongreson en Paris, 1925. Fondis »Skolta Heroldo.« 1926.

Ramo E. — ps. de s-ino M. Milson, tradukinto de la romano »Fabiola«. (v.)

Ramstedt Gustav John, finno, d-ro, prof. eksministro. Nask. 22 okt. 1873 en Tammsaari. Univ. prof. pri altaja lingvoscienco, 1918, de 1919 ĝis 1930 ambasadoro de F. en Tokio por Japanujo kaj Ĉinujo. Sciencaj esplorvojaĝoj en Mongolujo kaj Ĉinujo. Unu el la unuaj finnaj e-istoj (de 1891). Propagando kaj kursoj. En 1908 serio da prelegoj en la Univ. de Helsinki pri »Lingvoscienco kaj E«. Tradukis el finna kaj japana lingvoj multajn versaĵojn, kiuj aperis en diversaj eldonaĵoj, i. a. en »Voĉoj de popoloj« (Kabe). Per sia aŭtoritato kiel lingvisto kaj diplomato

multe helpis al la movado ĉe la oficialaj rondoj. Dum sia restado en Japanujo subtenis E-n en tiu lando.

Ranft Walter, germano, bankoficisto. Nask. 2 apr. 1892 en Niederlössnitz apud Dresden. E-isto de 1911. Veninte al Dresden en 1920 li unuigis la tieajn grupojn al 500-membra societo, kies prez. li estis dum kelkaj jaroj. Afergvidanto de GEA, 1920—24. Fondis en 1922 la KEU en Dresden-Radebeul kies prez. li estas, kaj red. ties bultenon »La Komercio«.

Raporto de la Aerolog'a Observatorio de Tateno (apud Tutiura). Verkita de Oishi. Unua volumo 1926, 213 p, sesa 1931, 210 p. Pri la lasta: »Grandformata kaĵero, kun multaj cifertabeloj, pri la observadoj, taritaj surtere, pri ĉiuj aeraj fenomenoj. Plie estas raporto kun teksto.« (G. S., 'E', 1932, p:106.) Gravaj dokumentoj pri la scienca uzado de E en Japanujo.

Rawson (rosen) Roy Robert, aŭstraliano, librovendisto. Nask. 11 majo 1898 en urbeto Wood's Point, Victoria. Sekr. de la EK en Melbourne de ĝia fondo en 1921 ĝis nun, UEA-del. dek jarojn. Organizanto de la sola Aŭ. E-ekzameno. Donis prelegojn monate de la Melburnaj radiaj stacioj aŭ 3 LO. aŭ 3 AR. de 1923 ĝis 1932. Komencis instrui la lingvon ĉiu dusemajne de 3 AR de 1932 ĝis nun. Vizitis la 13-an UK-n en Praha 1921 kaj poste travojaĝis la ĉefajn eŭropajn landojn.

Reaperantoj, dramo familia de Ibsen, trad. Büneemann. 1925, 112 p. »Strange impresiga kaj pensiga verko. Ĉiuj pensoj, ĉiuj intencoj de l' aŭtoro klare kompreniĝas en la traduko.« (G. S., 'E', 1925, p:170.)

Rebček (rjebiček) Josef, ĉeĥo, fervoja oficisto en Olomouc. Nask. 6 aŭg. 1875 en Salgótarján (Hungarujo). Ellaboranto de fervojfaka terminaro. Memstare eld.: »Int. konvencioj pri fervojaj person-, pakaj- kaj fretaj-trafikoj«, 1930.

Recenzo. V. Kritiko.

Redondo Ituarte Fernando, hispano, militisto, staba subkolonelo. Nask. 2 nov. 1882 en Mahón, Balears. Estis kunlaboranto de respublikanaj kaj socialistaj gazetoj pri temoj E-a, teozo-

fiaj kaj politikaj. Fond. du EG-jn, gvidis multajn kursojn. Kunlab. al kelkaj E-revuoj kaj nun dir. de »HE-Gazeto«. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Reed (rid) Edwin C., usonano, ekonomiano kaj advokato. Nask. 17 aŭg. 1877 en Cambridge (Mass). E-isto de 1903. Sek. de EANA 1908—13.

Reed (rid) Ivy Kellerman, usonano, edzino de E. C. Reed Nask. 8. jul. 1877 en Oshkosh (Wisconsin). E-isto de 1905. Aŭtoro de lernolibro, tradukinto de »Kiel Plaĉas al Vi«; kaj »Reĝo de la Ora Rivero«.

Reformoj en E. Reformo estas sistema ŝanĝo de fundaj lingvo-elementoj. La R-ismo naskiĝis kune kun E: de 1891 ĝis 1894 la gazeto »Esperantisto« estis plena de diversaj R-provoj. Devigite de multflankaj postuloj, Z mem publikigis en 1894 planan R-projekton kaj submetis ĝin al voĉdonado. La projekto kaj ĉia ŝanĝo estis forjetita. (v. Reformprojekto de Z 1894.) Malkontente pro tio, multaj R-emuloj forlasis E-n, sed ilia ekziĝo tute ne malutilis, eĉ kontraŭe: la lingvo, liberiginte de la senfruktaj kaj senŝancaj diskutoj, de tiam povis praktike evolui trankvile. Estas evidente, ke en aferoj, pri kiuj absoluta akordigo ne eblas, la sola bona solvo estas obeo al aŭtoritato, eĉ se ties propono ne estas la imageble plej perfekta: en lingvaj aferoj la unueco ja estas pli valora kaj grava ol la — eterne diskutebla — perfekteco. Vere, post la ĉeso de la diskutoj E tiel bone prosperis, ke kelkaj eminentaj R-uloj (inter ili Grabowski) revenis al la movado. La R-agitadoj de la Kanada gazeto (La Lumo) kaj de Paul Berthelot (1903—04) restis neatentitaj. En 1907 sekvis danĝera atako, fare de l' »Delegacio por la adopto de helplingvo internacia«, kiu »principe adoptis E-n«, sed praktike — Idon (v. tie). Tamen, E estis jam tiom fortikiĝinta, ke ĉi tiu atako ne povis ĝin grave vundi, malgraŭ ke proksimume la dekonono de la E-istaro inter ili tre eminentaj E-istoj: de Beaufront (patro de Ido), Moch, Ahlberg, Kofman, Schneeberger ktp. aliĝis al la nova lingvo. Sed la E-

istaj amasoj (jam ekzistis tiaj) restis fidelaj, la skismanoj estis eligitaj, kaj tiel la R. ĉesis esti interna afero, ĝi izoliĝis. La reago de l' skismo estis, ke inter la E-istaro pliigi la konservismo, ĉio nova iĝis suspektinda. La ĉefa celo de la E-a Akademio kaj Lingva Komitato estis de tiam la konservado de la lingvo kontraŭ ĉia R. Post ĉi tiu tempo R-oj ne plu endanĝerigis la lingvon; la provoj de Roman ski, Tihomirov, Sentis, de Saussure-Antido restis tute sen influo.

Oni ne devas intermiksi kun R. la pacan evoluigon de la lingvo, kiu volas sen rompo kaj perforto riĉigi la lingvon, ĝin fleksebligi kaj kapabligi por fakaj bezonoj kaj literaturaj kaj poeziaj valoroj. Inter la du tendencoj la diferenco estas, ke la R. ŝanĝas, dum la evoluigo aldonas, ke la R. eliras el aprioriaj principoj, ekz. el la perforta validigo de l' principoj E-ologiaj (V. tie), aŭ el arbitraj derivreguloj, dum la evoluigon direktas praktikaj bezonoj. La evoluigo ofte konscie rezignas pri la plej perfekta solvo, por konservi la tradicion. Ekzemple ĝi preferas la malpli perfektajn fare de, age de, de per al la perfekta par, ĉar la enkonduko de ĉi lasta signifus devigan uzon ĉe ĉiu pasiva participo kaj per tio farus rompan ŝanĝon en la lingvo. La gvidinio de la evoluigo devas esti la Z-a principo pri la kontinueco de la lingvo, kiu validas en ĉiu lingvo vivanta. Nur la nekompreno pri tio, nur la nekomprenebla ignoro de la riĉa E-a literaturo kaj vaste uzata parollingvo povas konduki homojn altkvalitajn (Sentis, de Saussure) al bedaŭrindaj kaj kompatindaj (ĉar senŝancaj) malŝparoj de tempo kaj energio.

KALOCSAY.

Noto de M. C. Butler. »Deper« estas privata inventaĵo absolute neakceptebla.

Reformprojekto de Zamenhof 1894.

La malrapida progreso de E en la unuaj jaroj estigis en multaj anoj la ideon, ke ŝanĝo de la ekstera lingva formo povos pliusukcesigi la propagandon. Z, kvankam kontraŭvole, sur-

prenis la gvidon de la reforma movado, »por depreni de ĝi la danĝerecon«. En 1894 li publikigis en »La E-isto« tutan sistemon de lingvaj reformoj, kun kompleta vortaro. La ĉefaj ŝanĝoj proponitaj estis: 1. La supersignoj malaperas. 2. La c est s el-parolata kiel malnqva ĉ; z kiel malnova c. 3. Artikolo ne plu ekzistas. 4. La akuzativo havas la saman formon kiel la nominativo. 5. En multenombro la substantivoj anstataŭas -o per -i. 6. La adjektivo finiĝas, same kiel la adverbo, per -e kaj ne ŝanĝas sian formon. 7. La tabelaj vortoj estas anstataŭataj per vortoj prenitaj el la naturaj lingvoj. 8. La prepozicio je estas forigata. — Ekzemploj el la reformita vortaro: borgeso (= burĝo), kavalo (= ĉevalo), omnu (= ĉiu), koruso (= horo), jovedo (= ĵaŭdo), meilo (= mejlo), epolo (= ŝultro), sik (= tiel). Oni aranĝis voĉdonon inter la E-istaro pri la 4 demandoj: 1. ĉu malakcepti ĉiajn reformojn, 2. ĉu akcepti sensanĝe la reformon ellaboritan de Z, 3. ĉu enkonduki aliajn reformojn, 4. ĉu akcepti la Z-an ellaborajon, sed iom modifite. La rezultajo, publikigita en nov. 1894, montris absolutan plimulton kontraŭ ĉiaj reformoj. Pledis por 1—157 voĉoj, por 2—11 voĉoj, por 3—3 voĉoj, por 4—93 voĉoj. En 1907 E. Javal, por apogi sian propagandon por novaj reformoj, represigis la Z-ajn ellaborajojn el 1894, cetere sen permeso kaj kontraŭ la volo de la aŭtoro. H. J. PLEHN.

Reininger (rajninger) József, (ps. Rr.; Satan; Föref), hungaro, eksprof. ĵurnalisto. Nask. 18 okt. 1896 en Ŝamorin, ĈSR. E-isto kaj UEA-del. de 1926. Artikoloj kaj recenzoj pri E-libroj en multaj hungarlingvaj gazetoj; ankaŭ gazetaj kursoj. — Hungaraj poem- kaj noveltradukoj el la verkoj de Baghy en lia poemokolekto »Hozsánna, Ember!« kaj en gazetoj. Lit. studoj en »La Nova Epoko«, 1929.

Reinking Adolf, germano, juĝisto. Prez. de GEA, 1912—20. Trad. »Minna de Barnhelm«.

Religio. V. Bahaismo, Biblio, Budhismo, Diservoj, Espero Katolika, IKA, Internaro, Katolika Mondo

KELI, Kolportista Asocio, La Juna Batalanto, Liberpensuloj, Metodistoj, MOKA, Novspirito, Oomoto, Preĝlibroj, Protestantoj, Respondoj al kontraŭreligiaj paroloj, Societo de Amikoj, Teozofio.

Rememoroj de Esperantisto. Verkita de ADA, 1925, 85 p. Priskribo de la unuaj tempoj de E en Bulgario; agado kaj suferado de la unuaj pioniroj, ĉefe laboristoj kaj studentoj.

Remers Hermann, germano, tornisto. Nask. en 1891 en Düsseldorf, mortis 14 okt. 1928. Aktivulo en la loka lab. grupo. Kunfondinto de la eldon-kooperativo de SAT kaj ĝia kasisto ĝis 1924. Kunlaboris al SAT-gazetoj.

Ren Sonkio, (formose: Lieang Unkeng), formosano ĉindevena, verkisto. Nask. 17 apr. 1895 en Taihoku. E-isto de 1914. Prez. de marksisma Formosa ES. Red. »Verda Ombro«, 1919—1925. Eldonis du verkojn de Eroŝenko, ambaŭ 1923. Verkis »Elementaj lecionoj de E«, 1932. — (Kuw.)

Reni Ameriĝo Luigi, italo, librotenisto, fakestro ĉe Fervoja Administracio. Nask. 22 febr. 1880 en Milano. Ellerninte E-n en 1907, deposed 1911 preskaŭ ĉiujare gvidis kursojn en Verona kaj apudaj urbetoj. En 1911 li organizis kun fratoj Liverani kaj Stevanini en Verona E konferencon kaj samloke fondis grupon. Tradukis »Itala Laborĉarto« kaj en 1928—30 zorgis la dissendon de ĉ. 1800 e-roj. Multaj prop. artikoloj.

Renn Ludwig, germano, romanverkisto kaj poeto, aŭtoro de la famaj germanlingvaj romanoj »Milito« kaj »Postmilito«. Nask. en 1896. E-isto de 1930. Komencis originale verki en E. En 1932 li estas elektita prez. de IAREV, sed malliberigita baldaŭ post la nacisocialista ekrego en Germanujo — li ne povis ankoraŭ aktive montri sin en la E-movado.

Respondkupono. Ĉar tiu de la poŝto ne estas vendata en diversaj landoj, kaj ofte ili kostas senproporcie tro multe, UEA kreis apartan respondkuponon, kiu cirkulas nur inter E-istoj. »Ĝi estas privata pagilo inter E-ista por faciligi precize tiujn etajn

pagojn, alimaniere tro multekoste fareblajn.»

Respondoj al kontraŭreligiaj paroloj. De Ségur, trad. Halbedl, 1925, 212 p. »Detala pledado por katolika dogmo kaj defendo kontraŭ ĉiuj eblaj kritikoj. Traduko bona.« (G. S., E, 1926, p: 56.)

Reŝetin N. L., ruso, general-leŭtenanto. Mortis 20 apr. 1924. Estis unu el la plej malnovaj E-istoj. Fondis en Tiflis EG-n kaj posedis en Kaŭkazo propran vilaon, nomitan de li, E'.

Revelo. Rejnlanda-Veŝalia E-Ligo. v. Germanujo.

Revoluciaj Esp.-Verkistoj unuigis en Int. Asocio de Rev. E.-Verkistoj (IAREV) en 1931. IAREV iniciatiĝis samtempe en du diversaj landoj, komence sen ia reciproka interligo — en Sovetunio kaj Germanlando. En Moskvo la asocion iniciatis N. Borisov (el Harkov), N. Hohlov kaj N. Nekrasov. En Germanlando, en Leipzig la ĉefa iniciatinto estis J. Flamo (el Estonio) kun partopreno de la konata germana rev. verkisto Ludwig Renn, kiu tiutempe nur antaŭnelonge E-istiĝis kaj komencis verki en E. Baldaŭ la ambaŭ grupoj unuigis kaj la nomitaj personoj ekformis provizoran estraron de IAREV, samtempe Renn estis unuanime elektita kiel prezidanto. Kiel centro de IAREV estis elektita Moskvo, sub la senperaj aŭspicioj de Int. Unio de Rev. Verkistoj. La sekretariaro de tiu ĉi lasta elektis specialan komisionon por enketi pri IAREV, konsistantan el itala verkisto G. Germanetto, hungaro J. Matejka kaj bulgaro G. Bakalov. Laŭ la raporto de tiu ĉi komisiono IAREV estis konfirmita oficiale kiel sekcio de IURV.

Baldaŭ al IAREV aĝis kaj subskribis ĝian ideologian deklaron: L. Bergiers, V. Bobinskij, H. Ĥrima, M. Irčan, L. Ivn, E. Izgur, V. Jurezanskij, V. Kuzmiĉ, M. Ljubin, I. Maĵeroviĉ, S. Michalicska, E. Miĥalski, I. Mišin, N. Pargaĉevskij, S. Pilipenko, V. Polakov, S. Rublov, A. Schwenk, G. Sevak, D. Snejko, E. Spiridoviĉ, I. Tkaĉuk, Samil Usmanov k. a. Krom tio multaj konataj

verkistoj proletaj esprimis sian simpatian al IAREV kaj promesis sian helpon, inter ili Henri Barbusse, Romain Rolland, grupo de ukrainaj kaj blankrusaj verkistoj.

En 1932—1933 en Moskvo estis eldonata ampleksa revuo de IAREV »La Nova Etapo«, red. de N. Nekrasov kaj dediĉita precipe al literaturo, kulturo kaj lingvoscienco. Samtempe Ekrelo eldonis kelkajn apartajn verkojn de IAREV-anoj: J. Flamo — »La maja festo«, H. Ĥrima — »Ce abismo«, V. Kuzmiĉ — »Solidareco«, M. Ljubin — »La Himno«, E. Miĥalski — »Fajro kuracas« k. a.

En 1934, post kiam ĉesis aperi »La Nova Etapo«, red. de N. Nekrasov transiris al E. Miĥalski en Stalino (Ukrainlando), kiu entreprenis kun helpo de H. Bourguignon en S. Maximin (Franclando) eldonadon de alia organo de IAREV. »Proleta Literaturo«. N. NEKRASOV.

Revolucio en la lingvoscienco. Skizoj de Andreev pri la jafetida lingvoteorio de Marr, 1929, 68 p. Materialisma instruo pri origino, evolado kaj estonteco de homa lingvo. Marr (sovetia lingvisto) instruas, ke antaŭe ekzistis ne buŝa, sed gesta (kinetika) lingvo, ke lingvoj ne devenis el unu fonto, sed kontraŭe kolektiĝis el diversaj lokoj per interkruciĝo kaj interfluo, ke ĉiuj lingvoj estas artefaritaj de la homoj, ke ili respektas klasbatalon de la homa socio kaj tendencas al unu tutmonda lingvo, ensorbonta elementojn el ĉiuj lingvoj de la mondo. Marr kelkfoje sufiĉe favore diris pri E, sed li konsideras ĝin kiel surogaton kaj kiel malvaste individuajn aferojn, tamen utilan en kondiĉoj de eŭropa vivo. La estonta tuthomara lingvo — laŭ Marr — devas esti artefarita kaj ĝi estos »lingvo de nova sistemo, tute speciala, ĝis nun ne ekzistanta« -eble eĉ ne sona, sed universale komprenebla per iu alia ankoraŭ trovota maniero. N. NEKRASOV.

Revuo de la Kongresoj. E-a aldono al »Revue des Congrès« oficiala organo de la »Office Central des Institutions Int.« en Bruselo. De apr.-sept. 1910 aperis 11 n-roj, la lastaj 5 n-roj estis nomataj: »Int. Revuo de la Kon-

gresoj kaj Paroladoj». Entute 50 p. 29×20. P. TARNOW.

Revuo Internacia. Monata gazeto por la vivo int. kaj por la lingvo E. Red. Ivan Se'ezn'ov kaj Sid'o. Nov. 1902—marto 1903, Bystrice-Hostyn. Eld. Ĉejka. Entute 160 p. 20×13 cm. »Progresema, klera, ĝi estis tro bona por sia epoko, kaj pro tio ĝi ne trovis merititan sukceson, nek subtenon.« (BIL, 3193.)

Rhodes (roŭdz) Frank Cockshott, anglo, agento. Nask. 27 sept. 1879 en Oakworth, Keighley. Propagandisto de 1904.

Rhodes (roŭdz) Joseph, ang'o, ĵurnalisto. Nask. 9 jul. 1856 en Keighley, mortis 28 febr. 1920 en K. Ekaŭdis pri E en 1901 (E-isto 5260). Starigis la unuan E-societon en Anglujo en K., nov. 1902. Verkoj: Traduko de »Ekzercaro«; »First Lessons in E«; »Vortaro de E-aj Rimoj«; kaj la ankoraŭ uzata »E Dictionary«, 547 p., 1908.

Rhorer (rorer) László, hungaro, d-ro, prof. de la medicina fiziko en univ. en Pécs. Nask. 18 okt. 1874 en Budapest. Prelego pri la te'evido dum la Somera Univ., UK en Budapest. Estis prez. de la loka grupo.

Rian Ragnvald, norvego, komercisto en Trondheim. Nask. 17 sept. 1891 en Skogn. E-isto de 1906. Multjara prez. de EG en T., kursgvidanto en Levanger kaj T. Sekr. de NEL 1912-13. Del. de UEA de 1913. Verkis gramatikon por koresponda kurso 1923 kaj Plenan N-E Vortaron kun 20 mil vortoj kaj vortderivaĵoj, 1932.

Richard C. Vincent, franco, loĝanta en Maroko, hemia ing. Lernis E-n en 1898. En 1905 paroladoj en »Cercle Communiste« en Genève (Svisujo) pri E. Samtempe kunlaboris kun P. Berthelot ĉe la gazeto »E«, poste oficiala organo de UEA. En 1906 fondis kun Evstifeieff, Berthelot, Louis, Blangarin, ktp. la gazeton »Int. Socia Revuo«. Del. de UEA de ĝia fondo, 1908. Ekpropagandis en Tanger (Maroko) en 1912. Kursoj tie en 1912, 1923, 1925 kun int. aŭdantaro.

Richardson (riĉardsn) Austin, anglo, abato, prof. de la angla lingvo en Instituto St. Louis, Bruxelles. Nask. 21 okt. 1843 en Amugnoabah, apud Bombay, de anglikanaj gepatroj. Far-

iĝis katoliko en 1864 kaj pastrigis en 1873. Vojaĝante al la UK en Bern kaj al la 4-a Kongreso de IKUE en Roma, pasigis kelkajn tagojn ĉe s-ino M. Milson, en Bossey, Francujo, por prepari la farataĵojn de la du kongresoj, mortis tie 19 aŭg. 1913 pro subita sufokatako. Diservon, okazintan por li, 26 aŭg. dum la UK en Bern, partoprenis ankaŭ Z. Estis animo de la katolika E-movado, prez. de IKUE kaj de Belga Kat. Ligo E-ista, dir. de »Espero Kato'ika«. Predikis ĉe la UK en Cambridge. Defendis E-n kontraŭ Idistaj atakoj.

Richardson (riĉardsn) Esther S., anglino, oficistino. Nask. 16 apr. 1903 en Woodborough. E-isto de 1918. Sekr. de Orientmezlanda EF de 1926.

Richt (riŝe) Charles, franco, fama scienculo. Nask. 26 aŭg. 1850 en Paris. Prof. ĉe la Fakultato de la Medicino, ano de la Scienca Akademio. Publikigis sennombran verkojn pri medicino kaj ankaŭ poeziaĵojn, dramojn, romanojn. Pioniro de la aviado, apostolo de la pacifismo, ktp. Ricevis la premion Nobel por la medicino. Tia grandanima scienculo estis destinita kompreni la E-an movadon. En ĉiu okazo li montris sian simpatian, farante paroladojn, skribante artikolojn, ktp. Du el liaj verkoj: »Paco kaj Milito« kaj la tragedio: »Sokrato« estas tradukitaj E-en.

Riedel (ridel) Kurt, germano, d-ro fil., docento ĉe la pedagogia instituto de la Teknika Altlernejo en Dresden. Nask. 29 okt. 1891 en Jugelsburg. Prelegis pri E en la Ped. Instituto, Dresden. Estis red. de »Int. Ped. Revuo«, 1929—33.

Riefing Bruno, norvego. Nask. 8 okt. 1895, mortis 22 dec. 1918. Studis filologion. E-istiĝis en 1912. Plej kapabla propagandisto kaj entuziasma E-isto, kun idealista kredo je la mondlingva afero, laboris por E per artikoloj kaj paroladoj. Aŭtoro de plena lernolibro, 1918. Elektiĝis prez. de NEL 1918, nur 2 monatojn antaŭ sia morto.

Rienzi (Michelis, di) Emile, franco, poŝta inspektoro (pensiita). Nask. 23 okt. 1861 en Marseille. Verkis multajn francajn librojn, ŝatas precipe la epizodan historion. Propagandis E-n per

paroladoj. Redaktis la »France Postale E-iste«, 1921—23.

Rikand Hindrek, estono, poŝtdirektoro, dipl. E lektoro. Nask. 22 dec. 1874 en Võru. Gvidis multajn kursojn, paroladis kaj skribis artikolojn pri E, verkis »Estonan E-Vortaron«. 1931. Eksestrarano de EAE, ktp.

Rikke - Tikke - Tak. Romano de Conscience, el la flandra trad. Maria Posenauer. 1912, 112 p. »Suferoj de du gejunuloj, amantaj unu la alian, sed perforte disigitaj. Korekta kaj bela stilo.« (A. S., »Ŭndo de E«, 1912, p. 177.)

Rimo. Ĉe la unuaj poetoj de E (Z, Grabowski, ktp.) ni trovas nur purajn rimojn (sendi-plendi, koro-floro). Sed ĉar tiaj rimoj estas troveblaj nur en limita kvanto, oni tre ofte renkontas ĉe ili sufiksrimojn (adasismojn), t. e. rimadon per sama elemento (dividitaj-disbatitaj, plorema-kantema), kiu propre ne estas rimo, nur vortripeto. Lastatempe pli kaj pli validiĝis la tendenco elimini la adasismojn, kaj helpi pri la rimmalriĉo per alia rimedo, per lat.n. parenkrimoj. La parenkrimoj utiligas la fonetikan parencecon inter la konsonantparoj b-p, g-k, d-t, f-v, ĉ-ĝ, s-z, ŝ-j, r-l, m-n (plenda-fremda, dolĉa-sorĉa, granda-migranta, glaso-nazo, ktp.). Precipe ĉe rusoj oni trovas krome radikrimojn (abortajn rimojn), tio estas: rimantaj radikoj kun diversaj finaĵoj (anĝelo-peli, grandajlando): ĉi tiu rimkutimo ŝajnas tute maltaŭga por E, kie la finaĵoj estas klare elparolataj kaj devas ne esti englutitaj. Vastan pritrakton de la tuta rimproblemo oni trovas en »Lingvo, Stilo, Formo« de Kalocsay.

Ĉar la E-aj rimoj estas ligitaj al la radikoj, oni povas, pli facile ol en iu alia lingvo, kunmeti E-ajn Rimarojn. Tiaj Rimaroj aperis de Rhodes (1905), de Parisot kaj Cart (1909), de Avoto (1918), de Jau-motte (1931), de Waringhien (1932). La dua kaj precipe la lasta (v. Parnasa Gvidlibro) enhavas ankaŭ pritrakton de poetiko.

Oni ne malmulte mokis pri ĉi tiuj Rimaroj, asertante, ke al vera poeto ili ne estas necesaj. Nu, estas vere ke originalajn poemojn, kie la penso

devas naskiĝi kun la formo, oni apenaŭ verkas per la helpo de tia lambastono. Sed ĉe tradukoj, iĉ povas spari multan tempon kaj cerbumon.

Literaturo, krom la menciitaj: F. R. Shelton: Pri sonetoj (Literaturo, okt.-dec. 1925); Teo Jung: Pri la E-a poezio (HDE, 1 kaj 8 apr. 1927); Hohlov: Rimo en E. (Esperanto, dec. 1927; febr. kaj marto, 1929). KALOCSAY.

Rimportretoj. Originale verkitaj de Kalocsay. 1931, 128 p. »Plaa albumeto, kun sesdeko da fotoj montrantaj la piej konatajn nunajn E-istojn, verkistojn, vortaristojn, administrantojn, recenzistojn, kaj pri ĉiu el ili la poeto verkis laŭdan aŭ informan, aŭ moka'an rondenforman poemeton.« (G. S., E, 1931, p. 145.)

Ritmo. Z adoptis la severan german-rusan metrikon. Laŭ tio, la sinsekvo de la silaboj akcentaj (-) kaj senakcentaj (o) naskas verspiedojn duopajn (jamb): o-; trokeo: -o) aŭ triopajn (daktilo: -oo; anapesto: oo-) kaj ĉiu verso konsistas el egalaj piedoj, do estas aŭ jamba, aŭ trokeaj, daktila, aŭ anapesta. Krome piedoj povas kombiniĝi, sed nur jambaj kun anapestaj (leviĝa skemo), aŭ trokeaj kun daktilaj (malleviĝa skemo). La marŝmaniero de la verso do devas resti la sama: aŭ leviĝa, aŭ malleviĝa. Ekzemploj:

jamba verso:

Alaŭdoj kantas super mi... (Z)

trokeaj verso:

Homoj en la oriento... (Z)

anapestaj verso:

Do levante la kapon ni iru (Baghy)

daktila-trokeaj verso:

Ni ĝin atingos per la potenco... (Z)

Sed jam Z moligis la nepran severecon de la R. Licencoj (poeziaj permesoj) uzitaj de li estas:

1. Trokeaj komenco de jamba skemo:

Signo de kor'dolora kajsovaĝa...

2. Svebo, t. e. paŭzo de R per tio, ke duonakcenta vorto (enklitiko) sekvanta akcenton (apostrofitan substantivon) tute perdas sian akcenton. Ekzemple:

La mond'ilin atakas senkritiko...

Al ĉi tiuj licencoj aliĝis lastatempe la

3. Stumblo, t. e. escepta anapestigo aŭ daktiligo de jambaj aŭ trokeaj versoj kun la malpliigo de l' piednombro. Ekzemple:

Kial via mord', se murdi vi ne povas,
Iru eble hejmon pli taŭgan vi
trovas ...
(Kalocsay.)

Aŭ:

Sub jug' vi kiel sekvas en kontento
L' ageman homon kun grav'
monotona ...
(Kalocsay.)

4. Komenca dutrokeo en jamba verso:

mirindege por ĉiu kor' sekura...
(Kalocsay.)

Per ĉi tiuj licencoj la E-a ritmo ŝajnas proksimiĝi al la pli libera latinida metriko, en kiu la ligiteco konsistas nur en la difinita silabnombro kaj en la cezuro, t. e. fiksita ripozo inter la du duonoj de la verso. Ankaŭ ĉi tiu R-sistemo havas jam sian tradicion en E (Grabowski, Jaime Grau Casas). Provizore superregas la Z-a sistemo (kun montritaj licencoj), sed ne estas maleble, ke la E-a metriko evoluos en la direkto de la pli liberaj skemoj.

Sola licenco ne estas ebla en la E-a ritmo, la karambolo, t. e. senpera sinsekvo de du akcentaj silaboj. Tio, pro la speciale forta akcentado E-a, efikas netolereble malagrabla.

Pri la metriko vastan pritrakton oni trovas en »Lingvo, Stilo, Formo« (1931), de Kalocsay kaj en »Parnasa Gvidlibro« (1932), de Waringhien. Kroma literaturo: Parizot: »E-a versifado kaj rimaro« (1909); Grabowski: »Nova Antologio« (fina noto, 1909); Kalocsay: »Eterna Bukedo« (fina noto; 1931); Dante-Kalocsay: »Infero« (fina noto; 1933); Parizot: »Pri la versarto en Ifigenio (Lingvo Int. dec. 1911); T. Jung: »Pri la E-a poezio« (HDE, 1 kaj 8 apr. 1927).

KALOCSAY.

Rjafiovski Hristo, bulgaro, d-ro, advokato. Nask. en 1881 en Gara Levski, mortis en 1934. Apartenis al literatura rondeto en Sofia (Nikolov, Petkov, Zografski, Spasov ktp.), kiu

eldonis B-lingvan gazeton, el kiu poste fariĝis la »Unua Paŝo«. En 1904 eldonis senpagan propagandan gazeton »Trumpetisto« kaj en 1907 »B. E-isto«. En 1906 eldonis prop. broŝuron.

Robert (rober) Emmanuel, franco, prof. de muziko, stenografio kaj lingvoj. Nask. 15 jun. 1860 en Vendœuvre (apud Poitiers). Honora prez. de Univ. Asocio de Blindulo-Organizajoj (franca sekcio). Eks-kasisto de SFPE. Fondis grupon »Verda Stelo«. Kunlaboris en diversaj revuoj. Verkis: kun Cart: »Notions Élémentaires d'E«, 1906; »Dictionnaire français-E«, 1907; »Klasika Libro«, 1912; »Notions complémentaires«, 1913. Sola: »Dictionnaire E-français«, 1909; »Cifera muziko per E«, 1908; »Deuxième année«, 1925; »Supplément commercial à l'E en dix leçons«, 1928; »Klasika legolibro«, 1929. Tradukoj: de Kraszewski »Kiel mortis la unuaj kristanoj«, 1927; de Catalany »Klari«, 1928; de Wiseman »Fabiola«, 1928.

Roberts James, anglo, lernejestro, 1859—82. Nask. 21 apr. 1839 en Constantine. E-istiĝis en 1922. 88-jara gajnis ateston de la Londona Cambro de Komerco. La plej aĝa E-isto de Britujo.

Robert (rober) Eugeno, franco, fervojisto. Nask. 20 jan. 1881 en Gien (Loiret). E-isto de 1915. Kuntond. de FEO; de 1921 gvidas ties korespondan kurson. Malnova SAT-ano.

Robertson Robert, anglo, bankpensiulo. Nask. 20 nov. 1861 en London. En lernejo stultulo pri lingvoj antikvaj kaj naciaj; frua studento kaj instruado de stenografio (Pitman-sistemo), propagandinto pri reformo de angla ortografio. E-isto de 1906 (N-o 13.422). Instruis de 1908, fondis antaŭ-urban grupon »Wood Green«, 1911, del. de UEA, 1912. De BEA: Konsilanto 1914; hon. kas. 1922, hon. sekr. 1925; prez. 1931. Prez. de E Publishing Co, 1928.

Robicsek (robiček) Pál, hungaro. nask. 1892 en Budapeŝt, mortis 7 marto 1931 en Moskva pro aeroplana akcidento (rotacianta helico krevigis la kranion). De 1914 ŝtatoficisto, 1918 ĵurnalisto, 1919 dum la sovetrespubliko popolkomisaro de poŝto, teleg-

rafo kaj telefono. Post elmigro al Sovetio li plenumis gravajn produkt-organizajn taskojn. Dum 1911—13 red. de »La Verda Standardo« kaj »Magyar Eszperantó Ujság« (H. E-gazeto). Verkis kelkajn lernolibrojn. En Sovetio li partoprenis SEU kaj SAT movadojn, 1925—28 prez. de la revizia komisiono de SEU.

Rob'n Gabriele'o, d-ro, rumano, bakteriologo. Nask. 24 marto 1869 en Alexandria, mortis 26 dec. 1911. E-isto de 1905. Fond. de RES (1907), verkis plurajn lernolibrojn kaj gramatikojn, flugfoliojn, diversajn artikolojn. Fond. kaj subtenanto de eldonejo »Editura E« (1907) kaj post unu jaro de la gazeto »Rumana E-isto«. Ĉeforganizinto de la unua Rumana kongreso en 1909. Kun multaj aliaj RES-anoj li partoprenis en 1910 la 4-an bulgaran E-kongreson en Sofia kaj la fondon de dunacia organo »Danubo«. Lernis la brajlan abocion kaj instruis E-n al la blinduloj. Post la Antwerpen-a UK faris planon »Kiel verdigi R-n en unu jaro«, sed la morto ĉesigis liajn laborojn.

Róbin (rubin) Wilhelm, d-ro, kuracisto de stomak-malsanoj en Warszawa. Nask. en 1873 en Piotrków. Estas prez. de la Kuracista Unuiĝo de la Pola Respubliko. Verkis multajn (35) sciencajn artikolojn, kreis la Gastrologian Societon en W. E-isto de 1892. Kune kun aliaj formis la unuan (neoficialan) E-rondeton en W. Dum la unua kunsido, 1 dec. 1893, ĉeestis: J. Janowski, d-ro J. Wasniewski, W. Róbin kaj Al. Blumental (frato de Leo Belmont). En 1904 oni malfermis la ES en W., sed li estis delegita pro la rusa-japana milito al Ĥabarovsk (Siberio) kiel kuracisto, kie li trovis jam organizitan E-movadon. Reveninte al W., li laboris por la ES en W. kiel ĝia sekr. En la lastaj jaroj vicprez. de PES. Iniciatis la fondon de TEKA, certan tempon redaktis la »Kuraciston«, poste fariĝis prez. de TEKA. Unua prez. de »Konkordo« en W. Ĉirkaŭ tiu tempo kune kun Sébert, Cart, Stettler li iniciatis la Int. Monumentan Komitaton por kolekti monon kaj starigi monumenton al Z. Fariĝis prez. de la Loka Mon. Komitato. Varbis por E tre influ-

riĉajn personojn. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Robinson (robinsn) George Somerville, anglo, kolonelo, eks-militkuracisto. Nask. 2 jun. 1857 en Kinsale. E-isto de 1907. Starigis grupon en Eastbourne, 1909. Prez. de Sudorienta EF de 1930.

Robinsono Kruso. Romano de Deŝio, el la angla trad. Krafft. 1908, 143 p., kun 34 bildoj.

Rockmann (rokman) Fritz, germano, instr. Nask. 25 sept. 1878 en Halberstadt. E-isto de 1905. Unu el la plej fruaj anoj de UEA (n-ro 27) kaj el la unuaj deŝigitoj. De jaroj ĝia germana peranto. Komitaciano kaj komisionano de UEA. Kunlaboranto de gazetoj. Eldonis kune kun Starck: »Int. legolibro«, 1908.

Rodel'ar-Bori'lo Manuel, kataluno, poŝtisto. Nask. 6 apr. 1885 en Barcelona. E-isto de 1909. Estis prez. kaj fond. de kelkaj grupoj, vicprez. de KEF. Kursgvidado, prop. laboro.

Rodet (rode), kuracisto. Estis ĝensekr. de la Grupo Medicina E-ista de Fr., fondita 1904. Kunlaboris en »Int. Sciencia Revuo«. Kunverkis: vortaron de anatomiaj vortoj en 4 lingvoj. Trad. de Fournier: »Por niaj filoj, kiam ili estos dekokjaraj«. En 1908 fariĝis Ildisto.

Rodger (roĝer) James, skoto, lernejestro. Nask. 14 okt. 1867. Verkis libron pri logaritmoj. Prez. de Skota EF, starigis grupon de Burntisland.

Roesel Otto Hugo, svedo, fabrikestro de lan-teksejo en Boras. Nask. 20 okt. 1869 en Münchenbernsdorf (Germanujo), venis al Svedujo en 1893. E-isto de 1911. Fond. (1911) kaj prez. de EK Boras, ĉesinta en 1915. Prop., kaj kursoj.

Rogers (roĝerz) Ernest Andrew, usonano, edukisto. Nask. 31 jul. 1881 en St Peter (Minnesota). Prez. de Montezuma Mountain School (privata lernejo por knaboj) ĉe Los Gatos (Cal.) de 1910, kie estas instruata E.

Rogler Willibald, aŭstro-germano, librotenisto en Schlafos apud Graz. Nask. 1 jul. 1894 en Lebing-Gleinz. E-isto de 1907. Kunhelpis la 3-an Tutaŭstran Kongreson en Graz, 1913. Sekr. de Stiria ES, 1914. Post la milito li kun Bartel denove vig-

ligis la E-movadon en Stirio; aranĝis, gvidis kursojn ankaŭ por la »infanoj al Hispanujo« en 1920 kaj en Voitsberg, kie varbis por E Schöpfer. Helpis starigi Interligan Oficejon de la aŭstraj E-sj dum Sudgermana Etago en Salzburg 1921. Kunfondis AED, kies estrarano li fariĝis, poste AEA. Alterne li estis estro kaj sekr. de la EG Graz. De 1913 membro de UEA. Trad. al E novelojn.

Rolandkanto. Popola eposo de la francoj el la 12-a jarcento. Trad. Noël, 1906, 175 p. Temo: batalo de Karlo la Granda kontraŭ la sarakenoj kaj heroa morto de Roland. (778.) Bona traduko.

Rollet de l' Isle (role dō lil) Maurice, franco, hidrografista generala inĝ. de la franca maristaro, estinta dir. de la Centra Oficejo hidrografista en Paris. Nask. 19 nov. 1859 en Paris. E-iĝis en 1903. Prezidis la Parizan sekcion »Latina Kvartalo« en 1909. Prez. SFPE 1911—23. Kunorganizinto de la UK en Paris, 1914. Prez. la Parizan grupon 1920. Membro de ICK. Ĝen. sekr. de ISAE. LK de 1909, dir. de la Akademia Sekcio de teknikaj vortaroj, redaktis ĝian bultenon. Prez. de la Akademio de 1933. Li tute direktis la francan movadon de 1911 ĝis 1923. Direktante sian atenton al la ĝenerala propagando, li redaktis kolekton da broŝuroj, unuj ĝeneralaj, aliaj difinitaj por individuaj propagando ĉe personoj de profesioj, al kiuj E povas esti utila (komercistoj, instruistoj, ktp). En 1932 li verkis broŝuron specialan por la deputitoj kaj senatanoj. Tiuj dokumentoj estas modeloj de klareco kaj de konvinka forto. Li agis persone, ĉiam en formo modera, sed per senlaca agado, en la intelektaj medioj kaj plej diversaj porsciencaj societoj. Al li oni dankas speciale la agadon de la Komerca ĉambro de Paris. (1920), kiun sekvis la raporto de Baudet, la enkondukon de E en la »Ecole Universelle par correspondance«, la proponon de la »Association française pour l' Avancement des Sciences« por E kaj la faman manifeston por E, subskribitan de pli ol 40 membroj de la Scienca Akademio, ĉe kiu Generalo Sebert estis jam klopodinta. Li kun-

laboris en diversaj E-aj gazetoj, precipe sciencaj. Krom prop. broŝuroj kaj scienca fundamenta terminaro, li direktis: »Provo de Marista Terminaro«, 1908; kaj verkis: »L' Initiation à l' E«, 1928. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio. L. BASTIEN.

Roma. Ĉefurbo de Italujo; 1,034,000 loĝantoj. 4-a int. katolika E-kongreso en 1913. — 27-a UK aŭg. 1935.

Romaj Elegioj. — La Taglibro. De Goethe, el la germana trad. K. A. Loosay, 1932, 80 p., kun ilustraĵoj. »La du versaj verkoj montras la erotikan Goethe. Sed ĉi tiu erotiko puriĝas alta kaj nobla en la flamo de l' arto kaj amo.« (El la Antaŭparolo.)

Romana'. Lingvoprojekto farita de Michaux. (v.) Ĝi estis propagandata de sia aŭtoro dum kaj post la mondmilito. La aŭtoro emfazas, ke en sia sistemo li ekstermis el E ĉiujn germanevenajn elementojn. (Michaux restis ankaŭ E-isto, laŭ sia letero al M. C. Butler.)

Romano pri Afrika Bieno. Romano de O. Schreiner, el la angla trad. S. A. Andrew. 1934, 270 p. »Sia romano estis esprimo de kuraĝa liberpensemo kaj indigna feminismo. (1883)... La alegorio pri la serĉado por la vero ŝajnas al mi ĝia plej bele konceptita peco, indiganta la tutan libron... La traduko estas lerte kaj sciencie farita, purlingva kaj bonstila.« (W. B. Johnson, »The British E-ist«, nov. 1934.)

Romein D. F., nederlandano, ofiĉiro, poste urbestro. Pioniro, helpanto de D. Uitterdijk. Estrarano de la unua EG en Utrecht kaj de la NES. Red. de »Holanda Pioniro« en 1910—12. Aŭtoro de la unua N. propaganda broŝuro kaj lernolibro.

Rondirantaj gazetoj. Laŭ la aserto de L. Cogen la ideo pri R. G. estis ĉerpita ĉe la stenografistoj, kiuj rondiris inter grupoj da personoj tiajn manuskriptojn por perfektigi en la stenografia arto per reciproka legado kaj korektado. La inicianto de R. G. en E estis Bayay el Douai (Francujo), kreinta en 1902 tre praktikan kaj int. klubeton, nomitan de li »Rondo Int. L' Unua«. La klubo konsistis po unu ano el ĉiu nacio, kaj speciale por tio aranĝitaj kajeraj de maneskribata

gazeto »Rondiranto« rondiris inter la klubanoj. Ĉiu skribis en ricevitajn kajoron sian originalan aŭ tradukitan artikolon, legis tiujn de la aliaj membroj, korektis ilin kaj sendis la kajoron pluen. Tio estis agrabila kaj interesa maniero por perfektigi en E kaj la ideo de Bavay baldaŭ trovis multajn adeptojn kaj imitantojn diverslande. — Preskaŭ samtempe aperis simila »Manuskripta Bulgara Rondiranto«, kies artikoloj poste aperis en »Rondiranto« presita. F-ino Ella Scherpeltz el Wallach-Meseritsch (Moravujo) kreis similan gazeton inter germaninoj kaj ĉehinoj, poste Th. Renard en Svisujo organizis similan gazeton, kiun partoprenis la ĉefaj tiamaj E-istoj de la lando. En Hispanujo R. Codorniu (en Murcia) kreis tutan stelaron el siaj R. G.: »Vaga Stelo« por aĵilandoj, »Hispana Stelo« por hispanoj, »Murcia Stelo« por Murciaj E-istoj, kaj »Arbara Stelo« por teknikaj artikoloj de arbaristoj. Poste aperis R. G. de rusaj E-istoj T. ŝčavinskij kaj V. Lojko. En Belgujo tia gazeto »Kunfratiĝo« estas kreita de L. Cogen. Pli malfrue rusa pastro I. Sirjaev (Baklanka, gub. de Vologda) dum la mondmilito kaj rusa revolucio longan tempon gvidis similan gazeton (kreitan de li) en Societo de Pastroj Ortodoksaj E-istoj. En tiu epoko estis ricevebla en Rusujo nenia E-gazeto, pro tio »La Rondiranto« havis grandan sukceson: iom post iom al ĝi aliĝis ne sole ĉiuj (ne multenombraj) rusaj pastroj E-istoj, sed multaj famaj ruslandaj E-istoj (P. Medem, V. Dimitriev, V. Szmurlo, S. Surovcev k. a.), preskaŭ ĉiuj tiamaj E-societoj kaj multaj (pli ol 150) E-istoj. Neniu angulo de vasteaga Rusujo estis trovebla, kie oni ne partoprenus ĉi tiun gazeton. Dum la civila milito, kiam estis neblaj postaj rilatoj de norda Rusujo kun la suda, en la lasta n-ro N. Krassovskij (Harkov) aperigis »Sudan Rondiranto« kaj iom pli malfrue V. Tenišov (Barnaul, Siberio) »Fajrerenon«, sed ambaŭ ili ne havis grandan sukceson.

»La London Rondiranto« ankoraŭ vivas; nun proks. 25-jara.

L. pri la temo: L. I. 1902, n-ro 3, 1903, n-ro 8; kaj la artikolojn de L.

Cogen en »Belga Sonoro« okt. 1902 kaj jan. 1904. I. SIRJAEV.

Rook (ruk) Mary Helena, angliano, telefonistino. Nask. 29 dec. 1896. E-istiĝis en 1917. Instruis E-n en Morley College, London, 1918-19. Anon de la administra komitato de BEA ktp.

Roome (rum) George William, angliano, instr. Nask. 27 nov. 1864, en Sheffield. E-istigita de Geoghegan en 1888. Prez. de EF de Yorkshire. Prez. de TAGE.

Rosa Pavel, slovako, oficisto de Ĝenerala pensia instituto en Bratislava (ĈSR). Nask. 9 okt. 1906 en Senica n. M. E-isto de 1923. Aktiva laboranto en la loka movado. Tradukas el la ĉeĥoslovaka literaturo.

Rosals Joan, kataluno, librovendisto. Nask. 15 apr. 1877 en Barcelona, mortis 15 apr. 1917 en B. E-isto de 1904. Diversaj postenoj en kelkaj grupoj, prez. de Katolika Ligo de K-aj E-istoj kaj red. de ĝia organo ĝis sia morto. Kursoj dum multaj jaroj, paroladoj, artikoloj. Senlaca pioniro.

Roscoe (rosko) Norman Keith, angliano, asekuraganto. Nask. 24 febr. 1891 en Cambrdge. E-isto de 1918. Loĝis en Japanujo, 1915—31, deĵoris ĉe la brita ambasadejo en Tokio.

Rosenberg Anders, svedo, popolerneja instr., poste gimnastika dir., akvo-kuracisto kaj higienisto. Nask. 19 jan. 1861 en Tyngelsjö. E-isto de 1907. Del. de UEA. Prop., kursgvidado, kelkaj libretoj.

Rosenberg Jakob, estono, komercisto. Nask. 9 febr. 1881 en Soosaare. E-isto de 1905. Fondinto kaj estrarano de la unua ES en Estonio »Revela E-ista Grupo« 1907—1913. Kunfondinto de la unua ES en Tartu »Dorpatia E-ista Societo«. Gvidis la unuan E-kurson en Tartu en 1911, poste gvidis multajn kursojn en Tallinn. Verkis kaj eldonis du legolibrojn (1911 kaj 1931), E-Estonan kaj Estonan-E Vortarojn (1912, 1923), »Estona Stelo« (1913) kaj kelkajn societajn ludarojn.

Rosentstock (rozenŝtok) Leon, d-ro, advokato. Nask. 28 jun. 1887 en Krakovo. Ĉefsekr. de la UK en 1912. Aperigis E-ajn tradukaĵojn en »P. E-

isto», »Univerŝo«, »La Revuo« k. a. Laŭreato ĉe Kataŭnaj Floraj Ludoj.

Rosicky Václav, ĉeĥo, d-ro fil. prof. Nask. 28 sept. 1850, mortis 8 febr. 1929 en Praha. Estis prez. de BUE deponit gĩa fondo ĝis kuniĝo kun ĈAE.

Roskes-D'rkens Catharina J., nederlandanino. Nask. 23 febr. 1855 en Rotterdam. E-istino de 1907. Propagandis kaj gvidis kursojn. Kun ŝia fratino Julia Isbrücker ŝi verkis lernolibron. Landa sekr. de la Vegetara Ligo E-ista de 1921. Verkis vivokantetojn kaj aliajn kantojn. Ŝi estas premiita kaj mencita de la Floraj Ludoj en Katalunujo en 1926-27-28.

Rotach (rotah) Georg, ŝviso, komerca oficisto. Nask. 16 nov. 1894 en Herisau. Stenografo laŭ Stolze-Schrey, adepto de la ekonomisocia ordo laŭ Silvio Gesell. E-isto de 1930, prez. de ES Bern de 1931. Kursgvidado. Uzo de E en ŝia profesio: li skribas al UEA-delegitoj petante ilin viziti la klientojn eksterlandajn, kiuj ne respondas al leteraj demandoj kaj ofertoj.

Rotario. »Rotary International« (RI), int. organizado fondita 23 febr. 1905 de adv. Paul Harris el Chicago. Fine de okt. 1933 ĝi havis 3619 klubojn kun 147.000 membroj el 60 landoj. En la regularo de RI la sesa celo havas paraĝrafojn pri int. frateco kaj kompreniĝo tre simile al interna ideo de E. En la komenco ĉefe disvastigata en Usono kaj Anglujo ĝi estis preskaŭ nura usona-angla movado, sed de 1925 RI forte kreskis tutmonde, kaj la diverslingveco kaŭzis malfacilaĵojn ĉe la ĉefoficejo kaj ĉe la jarkunvenoj.

En 1927 kelkaj E-istoj R-anoj komencis propagandi E-n kaj la R-klubo de Perth Amboy, Usono, prezentis proponon al la R-kongreso en Ostende, ke ĝi akceptu E-n kiel oficialan helplingvon por R-klubo. Dum 1928-30 la ĉefaj R-revuoj, ekz. »The Rotarian«, Chicago, kaj »The Rotary Wheel«, London, aperigis artikolojn kaj parte regulajn paĝojn pri E kaj multaj paroladoj okazis en diversaj R-klubo.

La jarkunveno de R-Asocio de GrandBritujo kaj Irlando (RIBI) en majo 1929 en Bournemouth deklaris

sin por alpreni de E kiel int. lingvo por R. Intertempe (1929) fondiĝis R-a E-Amikaro, kiu eldonas la gazeton »Mondamikeco«, red. de ĝia unua prez. Douglas P. Boatman. La Direktanta Komitato sidis en Britujo de 1929 ĝis 1930, en Francujo de 1931 ĝis 1932, en Germanujo de 1932 ĝis 1933 kaj nun estas en Nederlando. (Prez. d-ro Meihuizen, 39; Rijnkade, Arnhem; sekr. Arn. Bloemendal, Binnensingel, 6, Deventer; kas. Heinsius, Apeldoorn.)

En sept. 1930 okazis en Den Haag la ĝis tiam plej granda regiona konferenco (3000 pers.), efektive la unua vere int. R-kongreso. Sir Charles Mander donis tie favoran raporton pri E, kaj pastro Andreo Cseh faris du paroladojn. La konferenco decidis meti la lingvan demandon kiel diskuttemon al la int. R-kongreso en Vien 1931. »The Rotary Wheel« ĉefrevuo de RIBI faris longan referaĵon kaj finis per jenaj vortoj: »Mankis nur unu aĵo por fari ĝin perfekta konferenco, la kapablo paroli unu kun la alia.«

En Vien 16 jun. 1931 Mander malfermis la diskuton pri lingva problemo, kelkaj E-istoj R-anoj (Warnier, Arnhold, Appelbaum) faris interesan demonstracion pri la valoro de E kaj la kongreso konstatis, ke »la problemoj pri la lingvaj malfacilaĵoj, ĝiaj rilatoj al la sesa celo de RI kaj ĝia solvo estas aferoj tre gravaj kaj ili koncernas al RI.« La kongreso decidis, ke la Int. Serva Komitato (ISC) esploru, 1. kiu helpa lingvo estas la plej praktika, kaj 2. kia procedo estos la plej efektiva por certigi la alprenon kaj disvastigon de tia lingvo ĉe ĉiuj nacioj.

ISC kunvenis en Zürich, 16-17 sept. 1931 kaj unuanime interkonsentis, ke 1. int. lingvo estas ĉef-faktoro en la laboro por int. bonvolo kaj kompreniĝo. Inter la konataj helplingvoj E estas la plej praktika pro ĝia simplereco kaj facila lernebleco, ĝia relative granda literaturo, vasta uzado, organizita anaro tra la tuta mondo, uzata kaj alprenita de granda nombro da mondorganizaĵoj. 2. la plej bona vojo por certigi la rekonon kaj disvastigon de E inter ĉiuj nacioj estas kun-

laborado kun lernejoj aŭtoritatuloj kaj ĝi proponas, ke ĉiuj R-klubo estu atentigataj pri la valoro de E kaj pri la graveco enkonduki E-n kiel fakon devigan en ĉiuj lernejoj kaj universitatoj. En nov. 1931 la demando estis submetata al speciala komitato por plua esplorado kaj la direktoraro de RI rekomendis al ĉiuj R-klubo studi kaj diskuti la aferon en siaj kunvenoj same kiel en la distriktaĵoj kaj tutlandaj konferencoj.

En la jarkunveno de RI en Boston, Usono, 26—30 jun. 1933, en kiu partoprenis 8456 R-anoj el 2021 kluboj de 57 landoj, oni decidis: »raĵtigi la delegitaron, se ĝi trovas ion konsilinde, formuli planon por efektivigi aŭ almenaŭ progresigi la organizadon de mond-konferenco por decidi, kia lingvo estu universale uzota kiel helpilingvo; kaj por oficiale kuraĝigi ĉiujn landojn dekreti aŭ rekomendi instruadon de la elektita helplingvo en la lernejoj.«

Eminenta franca Rotariano Maurice Duperré, vicprez. de RI (1933-34) sekvis kurson de Andreo Cseh kaj estas konvinkita pri la valoro de E. — André Baudet, eks-prez. de la Komercambro en Paris, estas honora membro de la R. K. en Paris.

Noto. La artikolon tralegis kaj kompletigis G. Warnier.

A. ARNESSEN.

Rotkvič Ivo, kroato, juristo. Nask. 23 okt. 1901 en Bjelovar. E-isto de 1921. Ĉefa kunlaboranto de d-ro Maruzzi. Longjara sekr. de la zagreba societo. Unu el ĉefaj organizintoj de la unua jugoslava E-kongreso (1923) kaj Jug. E-Ligo, kie li sekretariis dum pluraj jaroj. Kunlab. en la Sudslava E-Servo. Kelkjaraj red. de »Konkordo« kaj kunred. de la »Balkana Konkordo«. Bona oratoro: multaj paroladoj pri E en diversaj urboj. Rekordulo en gvidado de kursoj en Jug. Multaj artikoloj en naciaj gazetoj. Speciale okupiĝas pri lingvistikaj problemoj. Kun Maruzzi verkis kroat.-E-vortaron. Tradukoj en diverslandaj E-gazetoj. Kiel apartaj libroj ĝis nun estas eldonitaj: »Aŭtuna vespero« (de M. Ogrizović), »Pangea« (de R. Hercég) kaj granda romano »Cezaro« (de M. Jelušić). Nuntempe vicprez.

de la J. E. L. kaj Zagreba societo.

Rousseau (ruso) Célestin, (ps. Aspido), franco, farmaciisto. Nask. 22 sept. 1861 en Le Portel (apud Boulogne-sur-Mer). Paroladisto ĉe la Societoj de Ruĝa Kruco; komitatano de diversaj farmaciistaj societoj en Francujo kaj korespondanto de eksterlandaj societoj. Plurfoje raportis ĉe Int. Kongresoj de Farmaci-societoj pri la Unueco de la Sciencaj Nomenklaturetoj. Verkis planan liston de la drogoj de 16 naciaj farmakopeoj kun E-a traduko. E-iĝis en 1902. Fondis grupon en Levallois-Perret. Estis komitatano de la Societo E-Croix-Rouge. Adm. de SFPE (1912—22). Sekr. de ISAE. Organizis kun Rollet de l' Isle la Int. Konferencon por la Scienco, Paris, 1925. Vicprez. de la Pariza grupo. Gen. sekr. de »La Maison de l'É«, de la fondo (1928). L. K. 1924. Sekr. de la Sekcio pri teknikaj vortaroj. Skribis en »Scienca Revuo«, en »Int. Medicina Revuo«, k. a. Verkis: »Poliglota Vade-mecum de Int. Farmacio«, 1911, kies unu volumo ekzistas en ĉiuj Universitataj bibliotekoj en la mondo, kaj en kiu E estas la ĉefa lingvo.

L. BASTIEN

Rousseau (ruso) Théophile, franco, prof. de matematiko. Nask. en 1876, mortige vundita apud Verdun 11 apr. 1916. E-iĝis en 1905. Allogita de la homfratiĝo, li ankaŭ komprenis, ke E devas esti enkondukata en la ĉiutagan vivon, ke nur utiligo de E por int. servoj povas reteni la aliĝintojn, kaj al tiuj celoj li dediĉis sian tutan laboron, reagante kontraŭ la pure predikema tendenco. Jam en 1905 li klopodis por la apliko de E al la turismo; li propagandis ĉe la hotelestroj, kaj instigis eldonadon de gvidfolioj kaj gvidlibroj. Precipe li iniciatis la E-Oficejojn, kiuj, kun la konsuloj proponitaj de Carles, estis kondukantaj al kreo de UEA. En 1906, li kaj Hodler fiksas la novan programon de la gazeto »E« (v. Berthelot), kiu estis fariĝonta la organo de tiuj institucioj. En 1907 li opiniis, ke por defendi E-n kontraŭ skismaj pereigaj atencoj, estas necese grupigi ĝiajn uzantojn. Tiam naskiĝis ideo pri int. organizaĵo, kiu post kelkaj monatoj konkretiĝis en UEA. Ĝis la milito li

alportis al UEA kaj al la gazeto E plej ageman kunlaboradon.

L. BASTIEN

Roux (ru) Alice, francino, prof. de germana lingvo ĉe liceoj por junulinoj. Nask. 24 apr. 1868 en Monestier-de-Clermont (apud Grenoble). E-iĝis en 1895, legitime en revuo artikolojn de Lombard. En majo 1897, ŝi aliĝis al la EK de Louhans (v. Chavef), kaj dum multaj jaroj propagandis. En Francujo ŝi estis la unua E-istino kaj la unua profesorino.

Roux (ru) Emile, franco, beletristikisto, antaŭe licea prof. en Grenoble. Unu el la kunfondintoj de SPPE (1898) kaj el la unuaj kaj plej fervoraj propagandistoj. Post du paroladoj en Grenoble, dank' al la apogo de Lacroix, gvidis la unuan publikan kurson en Fr. (jan. 1898). Paroladoj kaj artikoloj en diversaj urboj kaj en Svisujo.

Roux (ru) Marcel, franco, sekr. Nask. 3 majo 1903 en Lyon. Sekr. de lab. grupo. Organizinto de la 7-a SAT-kongreso. Prop. art. koloj. Kunlaboris al »Sennaciulo«.

Rowe (rou) Frederic Geach, anglo. Nask. 5 nov. 1841 en St. Agnes. E-istigita de J. Rhodes, 1902. Ĉeestis la int. E-kunvenon en Havre, 1904. Fondis grupon de Nottingham, 1905. Verkis E-ajn kantojn.

Royer (rüaje) Cécile, francino, ŝtatoficistino. Nask. 25 jan. 1876 en Nuits-Saint-Georges (apud Dijon). De 1903 gvidis multajn kursojn kaj varbis multajn anojn. Estis vicprez. de la sekcio »Latina Kvartalo«. Sekr. de Presa E-a Societo (1906—14). Direktis »Juna E-isto«. Sekr. kaj kas. de diversaj francaj ES-j. Artikoloj kaj noveloj. Kun J. de Bloch tradukis: »Estonta Milito«, 1907.

Rublov Sergej, ruso, sovetiano, inĝ., kemiisto en farbo-industrio (pigmentoj por ole-farboj). Nask. 14 jan. 1901 en Odessa. E-isto de 1919. En 1921—29 unu el la gvidantoj de la E-movado en O. En 1925—28 membro de CK SEU. De 1925 membro de la Lingva Komisiono de SEU, de 1929 LK. Lia ĉefa scienc-esplora laboro pri E estas kvanta kaj kvanta analizo de E-aj radikoj. La kvanta analizo

estas farita en 1926—27 per grupo da E-istoj, sub lia gvidado, kaj la rezulto publikigita en la almanako »Kvardek Jaroj«, 1927. La kvanta analizo donis bazon por verkado de la lernolibro »E-Rondeto«, aperinta en rusa (eldonkvanto 90 miloj), ukraina, germana, franca kaj bulgara lingvoj, entute en 15 eldonoj. De 1931 li preparas grandan Strukturan Vortaron de E, kiu resumas la kvalitan analizon de E-aj radikoj Trad. »La kemio de universo« de Fersman, 1925; »La vojo al scienco de estonto«, 1928; kunlaboris en la trad. de la romano »Ruĝa stelo« de Bogdanov 1929; kaj de la versajoj »Per voĉo plena« de Majakovskij 1930. Multaj artikoloj en revuoj.

Rudnicki Stanislaw, polo, oficisto. Nask. 7 majo 1877. Fervora disvastiganto de l' bicikla sporto. E-isto de 1906, UEA-del. 15 jarojn. Organizinto de la 8-a UK, ĉefsekr. de la 23-a UK, ambaŭ en Krakovo.

Ruĝa Kruco. Laŭ la konvencio de Genève (1864) la vunditoj kaj malsanuloj sur la militkampoj ne estas rigardataj kiel malamikoj kaj oni deklaris la neŭtralecon ankaŭ de la kuracistoj kaj flegistoj. La insigno de tiuj ĉi helpaj organizaĵoj fariĝis laŭ la blazono de la urbo Genève la ruĝa kruco kaj iom post iom en la tuta mondo fondiĝis R. K. societoj kaj funkcias ankaŭ int. organizo de la R. K.

La iniciatinto de aplikado de E ĉe la R. K. estis la prop-isto de E en la franca armeo, kapitano Bayol. Antaŭ la 2-a UK li eldonis libreton pri utileco de E por flegado de diverslingvaj vunditoj, ankaŭ specialajn ŝlosilojn kun necesa frazaro por flega servo. Post tio E komencis penetri en la naciajn societojn de R. K. Ekz. en 1907 en la urbodomo de Antwerpen Van der Biest legis referaton pri E por anoj de Belga R. K. Samjare en la franca societo de R. K. oni fondis nacian komitaton por prop. de E. En 1909 administracio de la germana R. K. en Königsberg proponis al sia subularo lerni E-n. Kelkan tempon (1910) aperis faka gazeto »E et Croix Rouge«. En 1911

por ruĝkrucaĵoj estas aranĝitaj E kursoj en Dresden; same en Kovno de Devjatnin.

Dum la 4-a UK en Dresden, 1908 je unua fojo reprezentis sin la Int. Komitato de la R. K. per A. Moynier, kiu ĉestis eksperimenton de ekzeca flegado de diverslingvaj vunditoj; ordonoj, demandoj k. a. estis tarataj sole en E. Partoprenis 50 portilistoj kaj multaj militaj kuracistoj en la korto de la Saksa R. K. La sama estis ripetata dum la 5-a UK en Barcelona, 1910. En 1916 Justin Godart, honora ano de UEA, franca ŝtata subsekretario de la saneca fakto (nun ministro), ĉirklere rekomendis la lernadon de E al la militistaj flegistoj kaj tiucele mendis 10.000 erojn de la lernolibro de E-Ruĝa Kruco de Bayol.

Post la miito la 10-a Int. Konferenco de la R. K., 1921, kiun prezidis G. Ador kaj partoprenis preskaŭ ĉiuj registaroj de la mondo, havis tre solenan karakteron. Ankaŭ E havis rolon tie. La ideoj de la dumilite mortigita apostolo de E ĉe R. K., kapitano Bayol, estis prezentataj al la deligitara komisiono. Ĝi diskutis proponon de fina delegito d-ro Wang kaj favore raportis al la plenkunsido. La 7 apr. la konferenco unuanime voĉdonis la jenan rezolucion: »Konstatinte la fakton, ke la lingva malfacilaĵo multmaniere malhelpas la realigon de l' int. idealo de la R. K., ĉu por savhelpo sur batalkampoj, ĉu inter militkaptitoj aŭ eĉ en la kongresoj de la R. K., la konferenco instigas ĉiujn ruĝkrucajn organizaĵojn, ke ili disvastigu la lernadon de la helplingvo E inter siaj anoj, kaj speciale ĉe la junulaj sekcioj, kiel unu el la plej potencaj rimedoj al int. kompreniĝo kaj kunlaborado laŭ la celo de la R. K.« Laŭ tiu ĉi rekomendo la nova statuto de la hispana R. K., adoptita la sekvintan jaron, jam enhavas unu paragrafon pri la devo jerni E-n. I. SIRJAEV.

Ruĝa Stelo. De A. Bogdanov, trad. el la rusa. 1929, 166 p. »Utopia romano pri socialisma ŝtato sur la ruĝa steio Marso. Kvankam la diversaj ĉapitroj estas tradukitaj de 7 tradukistoj, la impresado estas tute unu-

eca.« (Jofo, »La Socialisto«, 1930, p:52.)

Ruĝo kaj Blanko. Rakontoj originale de L. Iyn. 1926, 68 p. »Karikaturoj, amuzaj sed ankaŭ akraj. Estas mokataj la organizo kaj faroj de l' nuna rusa reĝimo.« (G. S., E, 1926, p:181.)

Ruĝuloj. Esprimo uzita en la antaŭmilita lab. E-movado, kiel komuna nomo por diverstendencaj socialistoj (socialdemokratoj kaj anarkistoj).

Rumana Bonhumoro, en kvin elektitaj rakontoj, trad. P. Firu kaj S. Pragan o 1932, 62 p. »Tre bona stilo. La rakontoj posedas lokan koloron, tipajn karakterojn, sed estas ofte pli ironiaj, ol simple bonhumoraj.« (G. S., E, 1932, p:105.)

Rumanujo. Kvankam jam en 1889 aperis »Mic vocabular pentru Romanii« (Vortareto por Rumanoj) de Marta Frollo, instruistino, E tariĝis pli konata en R-ujo nur en 1904, kiam H. Fischer, industriisto en Galati, faris la unuan kurson kaj fondis tie la unuan rondon E-istan kun la farmaciisto Toma Aburel kaj d-ro Kaner.

En 1907, I. Negreanu, advokato en Bukureŝto, per gazetartikoloj atentigis la publikon pri la lingvo int. kaj d-ro G. Robin, konata kemiisto, komencis vigran propagandon, fondis la Rumanan E-societon kaj aperigis la unuan lernolibron. En 1908 d-ro S. Kimel, dentkuracisto, komencis unuan kursan instruadon en Bukureŝto kaj eldonis novan kurson kompletan de E. Tiam komenciĝis brila periodo de E en la lando; en Galati aperis la »R. Gazeto E-ista« kaj en Bukureŝto la »R. E-isto«, kiu donis antaŭenpuŝon al la tiam ekflorinta movado kaj E, venkinte la indiferecon de la publiko, disvastiĝis en la tuta lando, tiel ke en 1909 povis okazi la unua rumanlanda E-kongreso en Bukureŝto, kun la partopreno de bulgaraj kaj serbaj E-istoj. La tro trua forpaso de d-ro Robin, kiu per siaj klopodoj kaj oferoj estigis organizitan movadon kaj helpis ĝin ĉiel, estis granda perdo por la RES, kies prez. li estis de ĝia fondiĝo.

La mondmilito, malhelpante ĝenerale la E-movadon, ĝin interrompis

ankaŭ en R-ujo. Multaj devis foriri al la batalkampo, kie pereis ankaŭ advokato P. Teodorescu, la daŭriginto de la laboro komencita de d-ro Robin.

Post la mondmilito komenciĝis nova epoko en la rumana E-movado, pro la vigla aktiveco kreita en Transilvanio kaj Banato, provincoj, kiuj antaŭ la mondmilito apartenis al Hungarujo. En printempo 1920 Andreo Ĉe en Sibiu (Hermannstadt, Nagyszeben) ellaboris sian faman instru-metodon kaj gvidis sian unuan kurson en la tiea Laborista Hejmo. Baldaŭ li kreis per siaj kursoj grand-nombran E-istaron en la urboj Targu-Mureș (kie la animo de la movado estis la nobla kultur-laboranto Jozefo Halász) kaj Cluj (Kolozsvár). Samtempe li komencis organizi la teritorion de UEA, varbante multajn anojn kaj starigante delegitojn. Je lia iniciato en 1922 kelkaj malnovaj pioniroj, inter kiuj Emil Nicolau en Ploești, Ion Giuglea kaj kapitano d-ro F. Iosif en Bukureŝto, rekomencis la agadon por landa organizo, kaj tiucele okazigis la duan R-landan E-kongreson en Cluj (1922), en kiu partoprenis grandnombre E-istoj el la tuta lando kaj ankaŭ el Bulgarujo. La kongreso reorganizis la malnovan RES-on.

Post tiu kongreso H. Fischer invitis A. Ĉe al la ĉefurbo kaj fondis kun li en Bukureŝto la E-Centron R-an, kun la celo praktike disvastigi E-n. Dank' al la malavara financa helpo de H. Fischer, komenciĝis grandskala publika agado. En la kursoj de A. Ĉe kaj lia entuziasma juna kunlaboranto Tiberio Morariu kreiĝis centoj da novaj E-istoj kaj per lertaj propagandaj aranĝoj la publika atento kaj simpatio turniĝis al E. Aparte menciindaj estas la oficialaj E-kursoj en la granda instruist-prepara lernejo en Gradiŝtea, en la policoficira lernejo kaj por la skoltaro. Gravan efikon havis ankaŭ la vizitoj de prof. P. Bovet el Genevo kaj de d-ro Won Kenn el Kantono (Ĉinujo).

La apostolan laboron de pastro Ĉe, post lia transiro al Genevo, daŭrigis T. Morariu.

Intertempe la restarigita RES sub

la honora prezido de generalo C. Gavanescu kaj G. L. Trancu-Lasi, eksministro, helpata de samideanaro, sub gvidado de s-ro Fischer — Galati — daŭrigis la laboron por plua disvastigado de la E-ismo. Per ĉiujaraj kongresoj de ĝi aranĝitaj (en Timișoara 1923; en Arad 1924; en Ploesti 1925; en Galati, sub la efektiva prezido de la ministro G. L. Trancu-Lasi, 1926; en Brasov 1927) pruvis al la vasta publiko la gravecon de E.

De 1927 pro la ĝenerala financa krizo la aranĝo de naciaj kongresoj ne estis ebla, sed la rumana E-istoj partoprenis regule la bulgarajn E-kongresojn kaj la rumana registaro delegis oficiale H. Fischer—Galati ĉe ĉiuj int. kongresoj kaj konferencoj aranĝitaj de la E-istoj.

Post la foriro de T. Morariu, al Svedujo H. Harabagiu, sekr. de RES kaj Sigmund Prager daŭrigis tiuj kursojn ĝis kiam ankaŭ tiu lasta iris helpi al Andreo Ĉe en liaj klopodoj por la monda movado.

Se la agado en la lando mem ne povis esti tre vigla, la rumanlanda movado povis tamen doni al la propaganda laboro monda tri migrantajn pionirojn: Andreo Ĉe, Tiberio Morariu kaj Sigismondo Pragano, kiuj vigle laborante en multaj landoj de Eŭropo, dum la lastaj ses jaroj, helpis antaŭenpuŝi nian E-n. En 1932 H. Fischer—Ga'a'i partoprenante oficiale la III-an Balkanan Konferencon okazinta en Bukureŝto, povis interesigi ĉiujn delegitojn pri E per diskutado en la komisioj kaj per speciala dokumentaro.

Krom RES daŭrigas la praktikan laboron la R-Centron E-ista, kies sekr. estas nova pioniro I. Ionescu-Capata, redaktoro de vegetarismaj revuoj, kiu dediĉas preskaŭ sian tutan agadon al la RĈE, kiu troviĝas en propra domo apud la Ekspozicio-Parko Carol kaj havas bibliotekon de ĉirkaŭ 1500 volumoj, pli ol 200 revuokolektojn, librovendejon, presejon E-istajn, organizas kursojn, publikas propagandilojn ktp. Krom tio vigle laboras Eugenia Morariu en Cluj, kiu direktas la E-Institiuton R-an kaj laboras por la teritorio de UEA.

(La artikolo'n preparis — E-Centro Rumana, kompletigis A. Cseh.)

Literaturo. Aŭtoroj de lernolibroj: Robin, Kimel, Beraru, Vanghelovici, ktp.; tiuj de vortaroj: Frollo, Kimel, Firu. Pli gravaj tradukaĵoj el la R. literaturo: »Niĉjo Mensogulo« kaj aliaj noveloj de Bratescu Voinescu; »Nobela peko« de M. Sadoveanu; »Sonorilo kaj kanono« de E. Isac; ĉiuj tri trad. de T. Morariu; »Rumana bonhumoro en elektitaj rakontoj«, trad. de P. Firu kaj S. Pragano.

Runeberg Hjalmar Johannes (Nino), svedo finnlanda, poeto, literaturisto, d-ro fil. Nask. 27 majo 1874 en Roma (Ital.), mortis 15 febr. 1934. Verkoj pri literaturo kaj folkloro; poezio originala kaj traduka en sveda lingvo. E-istiĝis en 1901 per Cart en Paris, partoprenis la UK en Boulogne, 1905. Fondinto kaj multjara prez. de la ES »La Polusstelo« en Helsinki, apartenis dum pluraj jaroj al la estraro de EAF. Kursoj por blinduloj en 1907 aŭ 1908 kaj en la Universitato de Helsinki dum pluraj jaroj. Trad. la dramon en versoj, »Jokanto« de H. Hertz.

Runstedt, Axel F., svedo, teol. d-

ro, paroĥa pastro en Gökhem, preposto. Nask. 28 jan. 1861 en Beateberg. Studento de la univ. en Upsala, li trovis en librovendejo 31 marto 1889 ekzempleron de Nürnberga lernolibro de E. Lernis. Korespondis i. a. kun Grabowski, Einstein kaj Z. Verkis lernilon, 1890. Poste ne aktiva. Mortis 1934.

R. U. R. Kolektiva dramo de Čapek. El la ĉeĥa trad. Moraviaj E-Pioniroj, 1926, 110 p. »Ni estas dum estonta tempo sur insulo, kie estas fabrikataj mekanikaj homoj, anstataŭontaj la verajn por ĉiuj laboroj.« (G. S., 'E', 1926, p: 55.)

Ruslando. v. ĉe la fino de la verko.

Rust John Cyprian, anglo, pastro anglikana. Mortis 29 jun. 1927. Dum 53 jaroj paroĥestro de Soham. Klera lingvisto, kun bona scio pri lingvoj hebrea, araba, siria krom kelkaj modernaj. La traduko de la »Nova Testamento« estas grandparte lia verko. La unua prediko en E estis la lia ĉe UK en Genève, 1906.

Ruus Neeme, estono. Fondinto de EG en Pärnu, kelktempe oficisto de estona ETK. Gvidinto de E-kursoj de Sveda E-Instituto.

S

Sabadell Alfons, kataluno, asekur-agento. Nask. okt. 1859 en Barcelona, mortis jan. 1932. en Italujo. La unua E-isto en B. (1901). Fondinto de la unua grupo en K-ujo kaj ĝia prez. multajn jarojn, longjara kursgvidanto, sennombraj paroladoj kaj artikoloj. Vicprez. de la komitato por la 5-a UK. Li estis la sola persono, kiu posedis la voĉon de Z en gramofondiskoĵ el malnovaj vaksaj cilindroj. Tradukoj de Santiago Ruysinol, el kiuj elstaras la dramo »La Patrino«, 1909 (?). L. K.

Sableroj. Verkitaj originale de M. H a n k e l. 1911, 92 p. »Poemetoj kaj prozaj pecoj. Ili elspiras la parfumon de dolĉaj rememoroj pri pasintaj kongresoj, de la lojaleco al nia komuna afero.« (A. E. W. »British E-ist«, 1911, p: 151.)

Saggioli (saĝiori) Giovanni (ps. Geo de Sabajoz), italo, radioteknikisto, eksurbestro en Fosso (1927-30). Nask. 22 jun. 1892 en Legnago. Li interesiĝis pri E ekde 1908. Del. de UEA de 1913. Prof. de E. Fondis grupojn en Legnago, Padova, Cittadella, Piazzola, ktp. Estras E-fakon de Int. Specimena Foiro de Padova de 1922. Kursoj en P. ktp. Organizis la nacian E-kongreson, 1931. Kunlaboris por Italujo en Schlomann Teknika Vortaro E-on (Vol. VIII.) kun Tiard, 1925. Trad. el E al itala »Fine mi komprenas la radion« de Aisberg, 1930, trad. el itala »Gvidlibro Tra Padova«.

Safiarov Aleksandr Andrejeviĉ, ruso, instr. Nask. 1865, finis matematikan fakultaton de univ. en Kazan, 1890. E-istiĝis en 1904 pro letero de S. Poljanskij. Veninte en 1907 Moskvon,

li fondis tie la famekonatan Librejon »Esperanto« kaj Moskvan Instituton de E. En 1909—17 li estis ĉefred. kaj eldonanto de »Ondo de E«, ĉeforgano de rusaj E-istoj. Ankaŭ li partoprenis gvidadon de Moskva ES, kiu dum kelkaj jaroj rifuĝis en lia loĝejo. Al la plumo de S. apartenas: »Sur vojo al kunfratiĝo de popoloj« (bona kolekto da artikoloj pri E en E kaj rusa lingvo); originala rakonto »Superforta ambicio«; »Signifo de akciaj societoj por E-movado«; pluraj lernolibroj kaj vortaroj por rusoj (»La tuta lingvo E«). Post la revolucio S. daŭrigis reeldonadon de siaj E-lernolibroj kaj vortaroj kaj partoprenis SEU-movadon: li estis dum kelkaj jaroj membro de CK SEU kaj aktive laboris en ties instruista sekcio kaj lingva komisiono.

Sakai Toshihiko, (—ŝi—), japano, konsilanto de socialisma partio. Nask. 25 nov. 1870 en Hukuoka-ken, mortis 1933 en Tôkyô. En 1905 aperigis la parolon de Kroita pri E en »Tyokugen«, semajna socialisma gazeto de li redaktita kaj duns instigon al socialistoj por E. — (Kuw.)

Sakaria Hillar, estono, dipl. organisto kaj komponisto, oficisto. Nask. 29. nov. 1899 en Tallinn. Fondinto de E Inst., fondinto kaj red. de »Informoj de EAE« (1922—31). Posedas la superan diplomon. Aŭtoro de multaj artikoloj en kaj pri E, gvidis kursojn, paroladis publike. La unua ŝtate pagita E instruisto estona (en 1925). Aŭtoro de »Enkonduko en la pedagogion«, 1932. Verkis ĥorkantojn, ktp. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Salokannel Hugo William, (ps. Bon-

templano), finno, staciestro. Nask. 19 jan. 1880 en Lahti. Fervore agadas en idealismaj movadoj: popolklorigado, pacifismo, vegetarismo. E-isto de 1904. Prez. de EAF ktp., eksred. de »Kristana Espero«. Publikigis du novajn eldonojn de la unua finna E-lernilo. Verkis »F-E frazilbreton«, 1919; porabstinecan verketon, 1926; kaj amason da flugfolioj kaj broŝuroj. Daŭre fervora prop-isto.

Saltego Trans Jarmiloj. Romano originale de Jean Forge. 1924, 192 p. Fantazia romano, kies personoj estas transportitaj el nia tempo en alian epokon. Simpla, vigla stilo.

Salvador, Centra Ameriko. Pioniro estis prof. Ricardo G. Abrill en San Salvador en 1904, al kiu helpis d-ro Santiago J. Barberena. La loka gazeto »Revista Científico Militar« preŝis en 1906 kurson de E. Laŭ la Dietterle-statistiko 1928 ekzistis nur izolaj E-istoj en la ĉefurbo.

I. SIRJAEV.

Samumo. Drameto en la dezerto. Originalo de Baghy, ludita dum la UK en Budapeŝt, 1929, aperis en la libro »Migranta Plumo« (v.).

Sandström Albin, svedo finlanda, dir. de kolor- kaj lakfabriko. Nask. 12 majo 1883 en Uusikaupunki. Gvidanta rolo en la svedlingva junua movado en Finnlando. Diversaj verkoj instrukciaj pri kolorigado kaj lakado. E-isto de 1907. Inter fondintoj de EAF kaj ĝia direkciaro de 1907, prez. 1912—ĉ. 1925. Prez. de la LKK por la UK en Helsinki. Ĉefred. de »Finna E-isto«, 1907—14, red. de »Movado« (Helsinki), 1924. Fondinto de »Ilarejo E-ista« (kaj ĝia dir. 1907—10), prez. de direkciaro de OY-Movado AB, 1920—24.

San Francisco. Urbo en Usono; 626.000 loĝantoj. — 11-a UK 22—29 aŭg. 1915; 163 aliĝintoj el 16 landoj; el Eŭropo partoprenis nur kelkaj. Ĉeftemo: kiel reorganizi la fortojn post la milito?

Santander. Teritorio, historio, kutimoj, monumentoj k. c. Aranĝis, tradukis kaj verkis Julio Mangad a Rosenörn. 128 p. kun ilustraĵoj, 1933. Grava turisma libro pri la hispana urbo S. (85.000 loĝantoj).

Sapunĝiev N. Georgi, bulgario, jurnalisto, urba bibliotekisto en Varna. Nask. 1898 en Dobriĉ. E-isto de 1922. Trad. el E kaj presigis en bulgaraj gazetoj: »La fundo de l' mizero« de Sieroszewski, »La interrompita kanto« de E. Orzeszko, »Krucumo« de A. Drozdov, plue pli ol cent orientajn fabelojn, legendojn kaj novelojn. Verkis en bulgaria lingvo detalan prezenton de l' disvolvo de la E-movado en diversaj landoj. E-lektoro.

Sardá-Simó Domeneç, kataluno, teksindustriisto. Nask. apr. 1884 en Sabadell, mortis 27 jun. 1911 en S. E-isto de 1905. La »patro« kaj fondinto de KEF, iniciatinto de la Int. Floraj Ludoj. Fondinto de grupoj en S. Senlaca kursgvidinto, konstanta prop-isto. Red. de »K-a E-isto« dum la unua jaro.

Sárosy (sárosi) Mihály, hungaro, kantisto. Nask. 1893 en Budapeŝt. E-istiĝis dum la rusa militkapiteco. Granda sukceso dum la UK en Nürnberg ĉe la prezentado de L. M. Populara kantisto dum artaj vesperoj. Du E-gramofondiskoj kun liaj kantoj.

Sasaki Macue, japanino, edzino de Tasku S., antaŭe f-ino Morita. Hejme instruis anglan lingvon kaj E. Nask. 3 majo 1886 en Tiba-si, mortis 18 jun. 1933 en Tokio, E-istino de 1920. Unue kredis kristanismon, sed poste aliĝis al SAT. Dank' al ŝia talenta gvido »Klara Rondeto«, Tokyo, preskati sola E-istina Klubo en J-ujo, sane kreskis. (v. Vortoj de M. S.)

Sasaki Tasku, japano, licea instr. Nask. 1 apr. 1883 en Tokyo-si. E-isto de 1907, SAT-anĝis 1925. Fondis studojn de Z-a gramatiko, kie krom li laboras J. Iŭaŝita k. a. Ilia esplormetodo estas tute objektiva: unue elektas kiel eble plej malgrandan temon (ekz. Depost) kaj kolektas ekzemplojn el ĉiuj paĝoj de Z-aj verkoj kaj ilin sisteme klasigas. Multaj gazetartikoloj. Ekz.: »Depost«, »La E-isto«, Tokyo, 1931-32. Kompilis: »Paroladoj de Z«, 1930 (komparis diversajn variantojn, reviziita eldono, 1933).

SAT — Sennacieca Asocio Tutmonda, v. Laborista movado.

Satchell Charles H. H., anglo, komerca vojaĝisto. Nask. 1 marto 1864 en Rugby. Tre konata en multaj pro-

vincaj grupoj. Konsilanto de BEA por Edinburgh.

Saussure (sosūr) René de, (ps. Antido), franco svisa, univ. prof. Kelkajn jarojn E-isto, kiu kunlaboris al »Tra la Mondo«, »La Revuo«, »E« kaj »Oficiala Gazeto«, red. de »Int. Scienca Revuo«, kaj de »Svisa Espero«. Trad. »Aline« de Ramuz, 1911, »Adèle Kamm« de Seipel, 1914, »La devo« de Naville, 1910. Elpensis la konsistemon »spesnilo« (v.). Forlasinte E-n, eldonis la lingvo-projekton »Antido«, tiun ĉi mezan solvon inter E kaj Ido, 1907. Poste aperigis la projekton »Esperantido« (1917) kaj ankaŭ skizojn de aliaj lingvoprojektoj.

M. C. Butler skribis pri li en »The Encyclopedia Britanica« (1927): »Prof. R. de Saussure, kredante, ke kelkaj malpli gravaj trajtoj de E malhelpas propagandon, celas ilin elimini, sed samtempe konservi la esencajn kvalitojn de la lingvo. De 1907 ĝis nun serio de eksperimentaj projektoj fluadas el lia lingvo-laboratorio: Antido I, Antido II, Lingvo Kosmopolita, Esperantido, kaj, fine, Nov-Esperanto (1925). Lia sinteno de scienca sendependeco kaj esploro, tamen, estas »voĉo krianta en la dezerto«.

Noto de M. C. B. Kiam venis la Idistaj krizoj, la E-ista mondo sentis la falsecon de la Idistaj argumentoj, sed ne povis ĝin rebati. En serio da brilaj monografoj S. defendis E-n kontraŭ Idistaj atakoj. Ĉiu posta verkisto aŭ instruisto ŝuldas al S.

»Saussure, — la pura, klara Mens',
La projektinto, projektonto,
Trabriŝ, kvazaŭ lumofonto,
La vortstrukturon lia Lens'«

(Kalocsay, Rimportretoj.)

Savia (della) Giovanni, italo, komercoficisto. Nask. 15 marto 1897 en Codroipo. E-isto de 1913, UEA-del. por Udine de 1919. Fondis grupon en U., 1923, gvidis kursojn, verkis artikolojn, trad. »Gvidlibreto tra U.«. Edziĝis per E je hungara E-istino Blanka Mandel, 1927.

Saville Georgo, usonano, judo, bakisto. Nask. 3 majo 1879 en San Francisco; de la 2-a ĝis 17-a jaro li vivis en Pollando. En sia bakista sindikato

en S. F., kies anoj parolis plejparte germane, S. (kun la helpo de usonaj patriotoj) ĉiam batalis por ke oni oficialigu la anglan lingvon, kiel interkomprenigilon por la poliglota membraro. En tio ili finfine sukcesis kaj unu lingvo plifratigis la anaron. En 1921 fariĝis E-isto (jam en New York), poste SAT-ano kaj li gvidis dum 8 jaroj la Nov-Jorkan SAT-anaron. Li verkis multajn artikolojn pri ekonomiaj kaj politikaj temoj, ĉefe por S-ulo. Trad. »La fera kalkanumo« de Jack London, 359 p., 1930. En manuskripto »La historio de la homaro« de Van Loon, ktp.

Savopol G., rumano, kapitano. Mortis en 1916, okaze de pulveja eksplodo en București. E-isto de 1906, laboris multe por E. Estis vicprez. de RES.

Schade (ŝade) Franz Josef, aŭstrogermano. Dum pli ol 25 jaroj li laboris por E. Estis ĝen. sekr., poste prez. de AED, ĝen. sekr. de la 16-a UK, 1924. Kunarangis Ĉe-kursojn en 1932, en Wien.

Schafer (ŝefer) Louisa Frederica Adela, angliano, solkantisto kaj lingvoinstruisto. Nask. 11 febr. 1865 en London. Multe laboris por E, aparte ĉe Londona EK. Verkis: »Tekstaro de Britaj Kantoj«. Ĉeestis la UK en Boulogne kaj alie. L. K.

Schamanek (ŝamanek) Josef, aŭstrogermano, burĝlerneja eksdir. kaj iama lektoro en la Teknika Altlernejo, en Wien. Nask. 15 marto 1859 en Prossnitz, (Morav.). Estis sekr. kaj prez. de AKLE kaj AED, vicprez. de 16-a UK. Unua lektoro por E en Teknika Altlernejo en Wien, 1917—30. Ĉeestis kiel del. la Instruistan Konferencon en Genève, 1920. Instigis la instalon de ŝtata ekzamena komisiono por E, kies komisaroj li fariĝis. Membro de Loka Kuratoria Komitato de IEMW. Verkis lernolibron laŭ parola metodo, 1914.

Schatz (ŝat) Gustav, germano, revizoro. Nask. 28 aŭg. 1885 en Königsberg. Verkis: »E-Führer«, lernolibro, 1926; »Einführung in die deutsche Sprachlehre« (kursaj helpolibroj kun ideoj por E teorio), 1927.

Schatz (ŝac) Róbert, hungaro, d-ro, kuracisto. Estis vicprez. kaj sekr. de

HES antaŭmilite. Grava sukceso dum la Int. Kuracista Kongreso, Budapeŝt, 1909. Red. de »H. E-isto«, 1909—10 kaj de »Juna E-isto«. Verkoj: »E-H. Frazlibro«, 1910; »H-E. Vortaro«, 1922; »H-E. Vortareto«, 1922. De multaj jaroj ne partoprenas en la movado.

Schauerhammer (ŝaŭerhamer) Gottlob Heinrich, germano, prof. por modernaj lingvoj. Nask. 8 aŭg. 1857 en Zeulenroda. E-istiĝis en Grenoble sekve de la konatiĝo kun Boirac. Paroladis pri E en Leipzig ĉe la Societo por moderna filologio en 1902. Estis inter la unuaj ekzamenantoj ĉe la E Instituto por la G. Respubliko kaj certe unu el la plej fruaj (eble ĉa unua) E-istoj en Leipzig.

Schauhuber (ŝaŭhuber) Alfred (Alfredo Miĥael), aŭstro-germano, industria oficisto. Nask. 8 apr. 1896 en Wien. Kursoj, artikoloj, kelkaj tradukaĵoj kaj originalaj poemoj, aperintaj en la poemlibro »Dekdu poetoj« (1934).

Scheibenreiter (ŝajbenraj:er) Franz, aŭstria germano, ĉeflerneja fakinstr. (matematiko, desegno kaj E). Nask. 30 nov. 1898 en Hadres. Estis sekr. de instr. fako de ALLE, grupestro de la VI-a grupo de ALLE. Laboris por TAGE kaj TAK. Verkis kun d-ro Casari la unuajn aŭstrajn E lernokaj legolibrojn por la lernejoj (du partoj, 1927, 1929). Kunlaboris al »La Socialisto« kaj »Tutmonda Kolektanto«. Red. de »Verda Revuo« 1935.

Scheibler (ŝajbler) Reinhold, (ps. Espero), germano, privatinstruisto, direktanto de 3 horistaroj kaj regiona direktanto de laborista horunuigo. Gvidas jam de 20 jaroj la grupon en Wurgwitz. Propagandas ĉefe inter instruistoj kaj laboristoj. Artikoloj precipe en ped. gazetoj kaj en »Sen-naciulo«. Verkis statistikon pri E en la lernejoj de Saksujo, 1925.

Schendeler (ŝhendeler) Paulus Antonius, nederlandano, prof. de geografio en komerc- kaj reallernejo. Nask. 26 febr. 1878 en 's Hertogenbosch. E-isto de 1909. Verkis prop. artikolojn kaj gvidis kursojn. Speciale okupis sin pri unueca elparolo de E kaj publikigis pri tiu temo bone fundamentitajn artikolojn. Red. ga-

zeton »Semereto« en 1916 kaj eldonis sub la sama titolo detalan kurs-on. Verkis lernolibron, ekzameno-sinprovilon kaj lernilon por lernejo. De 1921 ĝen. sekr. de IKUE.

Scherer (ŝirer) Joseph R., usonano, banksekciestro. Nask. 24 jan. 1901 en Fribourg (Svisujo). Prez. de EG de Los Angeles (Cal.) 1928—30. En 1930—32 vojaĝis kiel speciala delegito de ICK tra 41 landoj kaj faris 322 lumbildparoladojn kaj radioparoladojn. Aŭtoro de »Ĉirkaŭ la mondon kun la Verda Stelo«, grava dokumento pri la praktika valoro de E. (1933.) Entute: unu el la plej lertaj propagandistoj de E.

Sch'bbye Einar, norvego, lektoro en Bergen kaj Oslo. Mortis 16 jan. 1931. E-isto de 1907. Fondinto kaj prez. de Societo de E-istoj en Bergen en 1909—18. Red. de »N. E-Gazeto« 1910—12, prez. de NEL 1913. Enkondukis kaj instruis E-n ĉe la komerca gimnazio en Bergen 1912. Re prezentis la N. registaron ĉe la UK 1907 kaj 1911. Multaj artikoloj.

Schiebl (ŝibl) Hans, aŭstro-germano, poŝtdir. en pensio en Wien. Speciale laboras en katolikaj rondoj por E. Longjara kas. de Kat. UE. Wien.

Schjerve Jens, norvego. Li estas unu el la plej kapablaj instruistoj de E laŭ Cseh-metodo. Li gvidis multajn kursojn en Norvegujo, Francujo kaj Usono, faris paroladojn. Pri lia agado l. numerojn de »La Praktiko« kaj HDE.

Schlaf (ŝlaf) L., germano, komercisto. Propagandis inter laboristoj, eldonis gazeton »Arbeiter E-ist«, 1910 kaj verkis lernolibron. Starigis Lab. E-istan Ligon. Estis eksigata el la movado pro profitcela agado en 1911.

Schmalzl (ŝmalcl) Josef, germano, prof. por matematiko kaj fiziko en supera reallernejo. Nask. 1 aŭg. 1883 en Saal. E-isto de 1909. Fondis ES en Augsburg, 1910, poste GEA-grupon en Weiden. Prez. de Bavara Ligo, prez. de konsilantaro de GEA. Pri laboris la 6-an volumon de E ein Kulturfaktor.

Schmid (ŝmid) Jakob, sviso, ŝtata oficisto (publika ekonomio). Nask. 14 marto 1869 en Dietwil. Membro de

la LK kaj de la Svisa Ekzamena Komitato. Pli frue prez. de SES kaj de ES Bern. Premioj en la Int. Floraj Ludoj. Verkis lernolibron por germanlingvanoj.

Schmidt (šmit) Adolf, germano, d-ro, univ. prof. en Berlin, dir. de astronomia observatorio en Potsdam ĝis 1928. Nask. 23 jul. 1860 en Breslau. Unuaranga fakulo en matematiko kaj termagneteco. Prez. de Int. Sciencia Asocio, 1907—08 kaj de G. Akademia Asocio, 1905—30 Vigle partoprenis en la pacifista movado antaŭ la milito. Propagandis E-n precipe inter sciencistoj per paroladoj, artikoloj kaj kursoj. Fondis kune kun Jean Borel kaj prof. Wetekamp la unuan Berlinan E-Grupon en 1904 (?1903). L. K. 1905—30.

Schmidt (šmit) Christian, germano. Pioniro en G. Estis prez. de la mondlingva societo en Nürnberg, grava societo de volapükistoj en N., kiu tiutempe estis unu el la plej fortaj centroj de volapükismo. Laŭ lia propono la societo en dec. 1888 decidis forlasi volapükon kaj aliĝis al E. Red. (kune kun Z) kaj eldonis la unuan E gazeton, »La E-isto«.

Schmidt (šmit) Reinhold, germano, privata instr. kaj verkisto, frato de S. A. Nask. 14, majo 1867 en Breslau. Kune kun sia frato apartenas al la unuaj pioniroj en G. Verkis: »Gustaf Vasa«, historia dramo en kvin aktoj, la unua originala dramo en E, 1910; »Bildaro de Goethe«, 1909; »La amkonkurantoj«, triakta komedio, 1911 kaj 1923; »Der grüne Stern«, prop. komedio, ludita en Göttingen, 1911.

Schmitz (šmie), pastro, estis misi-ano en Brazilo, Kanarioj, fine en Palestino. Li estis scienculo, prop-isto de E kaj aŭtoro de interesaj artikoloj. (UEA-jarlibro, 1927.)

Schmucker Aldo Ferdinando, italo, d-ro de leĝoscienco kaj instr. en Genova. Nask. en G. E-isto de 1910. Kunfondinto de Liguria E-Instituto en G. 1912. Gvidis multajn kursojn en tiu urbo kaj en la apudaj komunumoj antaŭ kaj post la milito; dum tri jaroj gvidis kurson ĉe la Univ. kaj tri jarojn ĉe vespera komunuma lernejo, ambaŭ oficialaj.

Schneeberger (šneberger) Friedrich, germano, svisa, pastro. Nask. en 1875, mortis 18 marto 1926 en Bern. E-isto de 1903. Estis unua prez. de Svisa ES kaj prez. de la 1-a UK. Pioniro de la E-a stenografio, alfaris al E la sistemon Stolze-Schrey, 1905. Kunlaboris al »Tra la Mondo«, »La Revuo«. Dum la Ido-krizo forlasis E-n; fariĝis prez. de la Ido-Akademio.

Schneider (šnajdr) Josef, germano, ing., prof. ĉe la germana komerca akademio en Karlovy Vary (Karlsbad, ĈSR). Nask. 13 majo 1895 en Moravska Ostrava. E-isto de 1924. Fondis grupon en K. V. Instruis oficiale E-n kiel laŭvolan fakon en sia lernejo.

Schneller (šneler) Hermann, germano, estro de popollernejo. Nask. 16 apr. 1886 en Torgau. Estis prez. de A. de G. Instruistoj, kunlaboranto de Int. Ped. Revuo.

Scholze (šolce) Gustav, germano, ing., prof. ĉe la ŝtata germana supera industria lernejo en Liberec (Ĉeĥoslovakujo). Nask. 28 jul. 1889 en Postřum. Reviviginto de la E-movado inter germanoj en Ĉ. Prez. de GEL, komitatano de UEA. Sukcesis uzigi E-n ĉe Reichenberg-a Foiro, kiu posedas E fakon. Kunlaboras je teknika fakvortaro. Instruis E-n en sia lernejo en Komerca Akademio.

Scholze (šolce) Linhart Hilde, germanino, kunlaborantino de fakaj gazetoj pri hejma arto. Nask. 16 dec. 1895 en Liberec (ĈSR). Prop. tekstoj en »Mart«. Aparte aperis »Rübezahl«, 1931.

Schönherr (šönher) Karl, germano, popollerneja instr. Nask. 24 sept. 1881 en Marienberg. Prez. de Dresdenaj E-Instruistoj. Verkis G-e detalan laŭmetodan lernolibron, 15-a eldono, 1928.

Schoofs (šhofs) Frans, belgo, sekr. de Antverpena Asocio de P' malkaraj loĝejoj. Nask. 22 majo 1888 en A., mortis 12 marto 1934 en A. E-isto de la junulaj jaroj. Kunfond. de la EG »La Verda Stelo« en A. kaj estis ĝia prez. pli ol 25 jarojn. Post la milito fariĝis dir. de la »Belga E-isto«, de 1927 prez. de BLE. Fondis kun kelkaj aliaj la eldonan societeton BEI kaj prezidis ĝian administrantar-

on. Ĉefdel. de UEA. Estis sekr. kaj fakte gvidanto de l' Konstanta Re prezentantaro de la Naciaj Societoj. Ĉeestis ĉiujn UK-jn post la milito kaj kunlaboris multe en la organizo de la 7-a kaj 20-a UK-j en A. Estis unu el la plej agemaj en la int. organizo de la movado. Entute: tre ampleksa agado por E.

Schoor (skur) Jan Van, belglandano, oficisto. Nask. 25 febr. 1896 en Antwerpen. Verkis: »Amo kaj Poezio«, kolekto de originalaj poemoj kaj multajn poeziaĵojn, kiuj aperis en diversaj revuoj. Tradukis: »Kapricoj de Mariano« kaj »La Du Amatinoj« de Musset, »Elektitaj Noveloj« de L. Baeckelmans, »Palieter« de F. Timmermans; kunlaboris al »Belga Antologio«, Flandra parto; kunlaboranto de diversaj gazetoj. Forlasis la movadon fine de 1933.

Schöpfer (söpfer) Franz, aŭstrogermano, iama lerneja dir., lernejkons. en Voitsberg, Stirio. Nask. 7 dec. 1866. Prop.isto, gvidis 3 kursojn en la mezlernejo.

Schramm (šram) Albert, germano, d-ro fil., prof., estro de la G. Akademio por Bibliotekistoj en Leipzig. Nask. 5 aŭg. 1880 en Sindelfingen. Eminent fakulo por ĉiuj aferoj, kiuj rilatas al la libroj, presado, ilustrado, skribo ktp. Vicprez. de la UK en Dresden, 1908. Sukcese propagandis E-n en oficialaj rondoj de Saksujo. Fondis la Saksan E-Instituton, kies unua dir. li estis. Ĉefkunlaboranto kaj poste red. de la gazetoj »Ĉirkaŭ la Mondo«, »La Bela Mondo« kaj »Universo.« Krom multaj gazetartikoloj verkis lernolibrojn, unu el ili aperis en 1923 en 31-a eldono.

Schröder (šröder) Johann, aŭstrogermano, red. Nask. 1869, mortis 13 jan. 1928 en Wien. Iniciatis la E-movadon en Wien, kie fondis EK-n 1902, kies unua prez. li estis. Prez. de antaŭmilita Ligo de Germanaj E-istoj en Aŭstrio. Ĉeestis la 1-an UK, kie li fariĝis LK. Li ludis gravan rolon en la katolika E-movado kaj estante red. de »Neuigkeitsweltblatt« li varbis per regulaj artikoloj. Prez. de 16-a UK kaj komisaro de ŝtata ekzamena komisiono por E. Gvidis multajn kursojn. Multajn jarojn li re-

daktis »Informaj Raportoj«, poste »Germanaŭstria E-isto« kaj »Espero Katolika«. Kunlaboris al »Tra la Mondo«, »Juna E-isto«. Verkis lernolibron 1906, trad. la dramon »La verda kakatuo« de Schnitzler, 1912.

Schröder Marie, (ps. Pen), danino, korespondanto, stenografo kaj jurnalista. Nask. 18 marto 1882, mortis akcidente falante de la monto Pilatus la 27 aŭg. 1909 dumvoje al la Barcelona UK. Laboris en diversaj idealaj kampoj (vegetara, virina, pacifista, junulara). E-isto de 1907. Iniciinto kaj kunfondinto de Konversacia EK en Kopenhago, de CDEL, kunred. de »Dana E-isto«. Si havis neordinaran organizan talenton kaj neelĉerpeblan energion.

Schulhof (ŝulhof) Stanislav, ĉeĥo, d-ro, dentkuracisto; ĉeĥa verkisto. Nask. 1864 en Lipka, mortis 18 aŭg. 1919 en Pardubice. Li vigle partoprenis en loka E-ista vivo en P. kaj publikigis multajn prop. artikolojn. Kolektoj de liaj originalaj poemoj: »Per espero al despero«, 1911; Kion la vivo alportis«, 1911; kaj »Aŭtunaj floroj«, 1912. »Tri volumetoj, en ili tridek poemoj. Konstanta evoluo kaj pliperfektigo. Prezentas sin homo, kiu simple kaj sincere rakontas al ni siajn sentojn kaj kies sentoj estas indaj por rakonti.« (Kopar, LM., 1922, p. 39.) La poemoj estas rimarkindaj laŭ formo eĉ lau enhavo. Post lia morto aperis de li antologio el ĉeĥaj poetoj: »Bohemaj grenatoj«, 1920, kies poezia lingvaĵo superas tiun de la originalaĵoj. S. KAMARYT.

Schuller (ŝuler) Béla, hungaro, maŝinŝeruristo. Nask. 24 apr. 1897 en Budapeŝt, E-isto de 1917, antaŭe Idisto. Fondis la 2-an kaj 6-an grupojn de HESL, estis ĝia prez. Verkis prop. broŝuron, 1925 (6000 e-roj). Paroladoj pri E en ĉ. 30 lokoj ĉ. 250-foje.

Schumann (ŝuman) Richard, germano, d-ro fil. kaj d-ro ing. h. k., prof. en Teknika Altlernejo en Wien. Nask. 9 majo 1864 en Glauchau. Germ. Verkoj astronomiaj, geodeziaj kaj matematikaj. Ekinteresiĝis pri E de post 1900 (mondekspozicio Paris). Lernis E-n en 1910 kaj gvidis kurson samjare en Teknika Altler-

nejo de Aachen. En 1914 »Faka grupo por ĝeneralaj sciencoj« en Teknika Altlernejo de Wien aplaudis lian proponon, fondi lektoraton por E, 1915 la profesoraro, 1916 la ministerio konsentis tion.

Schwartz (ŝvarc) Alexander, germano, komercisto, (privata sekr.) Nask. 28 apr. 1888 en Aldringen. Kancelariestro kaj afergvidanto de la segilfabriko de Wüster et Co., Wieselburg, Aŭstrio. E-isto de 1908. Kondukanto de la grupoj en Dortmund kaj Berlin. Aferkondukanto de GEA en Berlin, 1926—29. De 1927 afergvidanto de la »Enciklopedia Vortaro« de Wüster. Kompilis la 8-an volumon »Das E ein Kulturfaktor«, 1928.

Schwartz (ŝvarc) Antoine, franco, polica inspektoro. Nask. 28 jan. 1898 en Trimbach (apud Strasbourg). Zorgas precipe pri gazetaj kaj polica E-aj aferoj. Vicprez. de Asocio Strasburga de E; adm. de »Information E-iste« de SFPE; kunlaboranto de »Tribune E-iste«; ĝen. sekr. de la Amikaro de policianoj de Francujo kaj kolonioj; delegito por Francujo de Int. Polica Ligo, kaj adm. redaktoro de »Int. Polica Bulteno.« Verkis (kun Jalmain): »Interprète du policier«, fakan libreton deklingvan enhavantan E-an parton.

Schwartz (ŝvarc) Raymond, franco bankoficisto. Nask. 8 apr. 1894 en Metz. Tie li fondis en 1913 EG »Amika Rondo«. Ekde 1920 li gvidis dum kelkaj jaroj la faman E-an kabareton »Verda Kato« en Parizo. En 1932 ĉefred. de la »Gazeto de la XXIV. Kongreso«. Li publikigis rimajojn jam en 1912 (en »Tutmonda Espero«) kaj post la milito poemojn kaj artikolojn en diversaj gazetoj, precipe en L. M. Ekde 1933 li redaktas la monatan spritgazeton, »La Pirato«. En S. la E-a mondo trovis sian humoriston, kiu la tro verdajn flankojn de la movado scias mirinde eklumigi per sia buba spegulpeceto. En la Pirato li estas vere la »terura infano« de la E-a familio: nenio restas kaŝita antaŭ li kaj nenion li indulgas, kiu aŭ kio estas inda je gringaco aŭ pinĉo. Sed pinĉante per moko, samtempe li tiklas per sprito,

tiel ke la pinĉito mem devas ridi anstataŭ indigni. — Liaj versaj verkoj »Verdkata Testamento« (1926) kaj »La Stranga Butiko« (1931) estas plenaj de la sukaj fruktoj de lia kurioza fantazio: kanzonoj laŭ kabareta stilo, ironia prezento de strangaj tipoj verdaj kaj neverdaj, akre trafaj kaj mildaj pikaj observoj, spritaj vortludoj. Ĉio ĉi, prezentita per perfekta verstekniko, montras lin kiel simpatian bohemon, kiu havas tre sanan racion, grandan ĝukapablon pri la etaj ĝojoj de l' vivo, kompreneman ridon pri ĉiu homa malforto, sanan ironion pri ĉio gravmiena kaj hipokrita. La samaj kvalitoj distingas liajn prozajn skizojn, aperintajn en la »Prozo Ridanta« (1928) Lia mallonga romano: »Anni kaj Montmartre«, rakontinta la danĝerajn aventurojn de naiva germana knabino en Parizo, estas unu el niaj plej plezure legeblaj originalaĵoj. En ĝi mankas ĉiu sentimentalita siropo aŭ gravmiena moralprediko kaj la akre trafa karakterizo, simpla, natura prezentmaniero kaj interesa templekto ĝin faras vere eta ĉefverko. Aparta valoro de la libro estas ĝia stilo: kerne E-a, facilflua, natura, plena de surprize vidigaj bildoj kaj ĉarma familiareco.

KALOCSAY.

Schwartz (ŝvarc) Tivadar, hungaro, d-ro, advokato. Fondis (1922) kaj eldonis la revuon »Literatura Mondo«, Verkis facilstilan romaneton »Modernaj Robinzonoj«, 1923.

Scienca Fundamento Esperanta Terminaro. De Rollet de l' Isle, 1931, 127 p. Kolekto de terminoj plejparte elĉerpitaj el artikoloj aperintaj en Scienca Revuo, en Scienca Gazeto, kaj en diversaj terminaroj, sisteme ordigitaj por prezento al la Akademio por konsistigi fundamentan bazon, sur kiu estos konstrueblaj terminaroj de ĉiuj sciencoj kaj teknikoj.

L. BASTIEN.

Scienca Gazeto. Int. revuo pri scienco kaj industrio. Red. Verax. 1912-14. Formato 25×18. Entute 472 p. (v. p: 178.) — Kun la sama titolo aperas de 1932 en Madison (Usono) dumonata gazeto. 23×15 cm.

Scienca kaj tekniko. Uzo de E eb- ligos int. kunlaboradon de sciencistoj

kaj teknikistoj, kio estas plej potenca fonto de progreso; revuoj kaj gazetoj redaktitaj en E estos legeblaj en ĉiuj landoj, kaj tiamaniere ĉiu teknikisto povos facile sciigi pri la laboroj faritaj en sia fako en la tuta mondo; en int. kongresoj profitdonaj interparoladoj, diskutoj havigos solvojn de la studataj demandoj, ktp. Unuvorte E faros al sciencistoj servojn, kiujn, preskaŭ ĝis la mezo de la pasinta jarcento, latina lingvo faris. Sed E prezentas tiun superecon, ke ĝi povas esti uzita de ĉiuj, ne nur skribe, sed ankaŭ parole.

Tuj de ĝia apero kelkaj sciencistoj komprenis tiun profiton, kaj klopodis diskonigi ĝin.

En 1899, korespondanto E. Naville prezentis al la Franca Akademio de Sciencoj komunikajon pri »Int. lingvo«; en 1901 Akademiano Generalo Sébert faris same pri »Sciencia utileco de int. helpa lingvo«, kaj prezentis leteron adresitan al »Int. Asocio de Akademioj«, kiu ricevis 20 subskribojn. Tuj poste korespondanto Ch. Méray sendis leteron »pri la servoj, kiujn povas havigi al Sciencoj la int. lingvo de Z.«

En la UK de 1906, en Ĝenevo, kunsidis la sciencamantoj, kiuj elektis prezidanto Sébert kaj sekretario Carlo Bourlet. Oni decidis proponi al la scienculoj konstantan uzon de E en iliaj int. kongresoj; peti ke la sciencaj revuoj akceptu artikolojn en E redaktitajn aŭ aldonu E-resumon de la artikoloj, redaktitaj en nacia lingvo; fine oni decidis subteni la Sciencan Revuon, kiu estis publikigata jam de 1903 en Paris, ĉe la firmo Hachette, kaj redaktita de Paul Fruictier.

En 1903 estas fondita Int. Sciencia Asocio E-ista, (ISAE) sub prezido de Sébert, kaj kies oficiala organo estis la Sciencia Revuo. Tiu societo rapide ricevis kuraĝigojn de multaj sciencistoj de ĉiuj landoj. Ĝi estis sinsekve prezidita de J. J. Thomson, de la Reĝa Akademio de London; Schmidt direktoro de observatorio de Potsdam; R. Benoit, direktoro de la Int. Oficejo de Pezaj kaj Mezuriloj; Huntington, univ. prof. en Usono. En ĝia patrona komitato troviĝis grandaj sciencistoj de fakistoj kaj famaj sciencis-

toj kiel Adelsköld, Appel, d'Arsonval, Becquerel, Berthelot, Bouchard, Deslandres, Flourmoy, Förster, Haller, William James, Poincaré, Ch. Richet, Maurice Leblanc, Lumière, Painlevé, ktp.

En 1912, la Sciencia Revuo estis anstataŭita de Sciencia Gazeto ankaŭ eldonata de Hachette (Paris) sub direktado de Verax.

En tiuj revuoj estis publikigitaj artikoloj pri la plej diversaj sciencaj kaj teknikaj temoj. Ebleco krei la necesajn terminojn, por E-igo de la preskaŭ ĉiuj int. vortoj de scienco kaj tekniko, multe faciligis tiujn publikigaĵojn.

Aperis vortaroj kaj terminaroj diktate redaktitaj, ekzemple: »Matematika terminaro« de Bricard, »Anatomia vortaro«, »Muzika terminaro« de Ménil, »Marista Terminaro« de Rollet de l'Isle, »Farmakologia terminaro« de Rousseau, ktp.

Uzante la vortojn aperintajn en la revuoj, Verax publikigis »Vocabulaire technique et technologique Français Esperanto« en 1907, kaj en 1910, »Enciklopedia Vortareto Esperanta«, kiu entenis ĉirkaŭ 20.000 vortojn.

Originalaj verkoj estis publikigitaj, nome »Absoluta analitika geometrio« de D-ro C. Vörös en du volumoj, kaj gravaj tradukoj; »Teorio de ondoj« de D-ro Kelte; »Rezisto de la gasaj kolonoj« de Villareal; »Novaj trigonometriaj sistemoj« de profesoro Dombrowski; »Kontinuo« de Huntington; kelkaj artikoloj aperis en »Bulteno de Oceanografia Instituto de Monaco«, kaj en »Meteorologia Bulteno de Observatorio« de Tokio.

La Asocio elektis komisionon por starigi teknikajn vortarojn kaj gvidi autorojn pri farado de la novaj terminoj. Ĝi komencis sian laboron, publikigante Konsilaron por la tarado de »Sciencaj kaj teknikaj vortoj«, kaj poste klopodis por starigi vortarojn de la puraj sciencoj. Ĝi publikigis »Nomenklaturon de la minerala kaj organika kemioj«, kaj elementojn de vortaroj de Kemio, Fiziko kaj Mekaniko.

Post la milito, kiu interrompis ĉiun agadon, la Asocio restariĝis en 1925, post int. konferenco organizita en

Parizo, sekve de deklaro favora al E, subskribita de pli ol 40 membroj de la Franca Akademio de Sciencoj; Prof. Cotton estis prez.; Prof. Bujwid de la Universitato de Kraków nun prezidas ĝin.

ISAE klopodis kun ne konstanta sukceso por konigi E-n en plej diversajn sciencajn kaj teknikajn mediojn, profitante je ĉiuj favoraj okazoj, ĉefe la int. kongresoj. La rezultatoj ne estas gravaj pro ĝenerala indiferecenteco de la sciencistoj pri tiu temo. Tamen du novaj faktoj multe favorigis ĝian agon; ili estas »Aera navigacio«, kiu necesigis int. lingvon por la meteorologiaj sciigoj — kaj la T. S. F. kiu montris barojn starigitajn kontraŭ ĝenerala interkompreno de la sendaĵoj, pro la diverseco de la lingvoj en kiuj ili estas faritaj. Malrapidaj, sed certaj, estas la progresoj, laŭ tiuj du direktoj.

Atentinda estas la disvastiĝo en Japanujo, kaj komprenebla, ĉar la sciencistoj de tiu lando devas publikigi siajn verkojn en angla lingvo, kies lernado estas malfacila kaj longa. En la medicina kaj meteorologia fakoj, la progresoj estas rimarkindaj.

Inter la verkoj de sciencistoj aŭ teknikistoj publikigitaj de dudek jaroj estas citindaj:

»Medicina teknika vortaro« de Briquet,

»Arkitekturo, Arkeologio, Konstruo kaj Arto« de Azorin,

»Farmakopea vortaro« de Japana Hermesa rondo,

»Maŝinfaka esperanta vortaro pri elementa« de Wüster,

»Komerca Vortaro en Esperanto« de Kreuz—Mazzolini,

»Leksikono Japana-esperanta de Kemio kaj Farmacio« de Japana Rondeto de Fakistoj,

»Juristisches Wörterbuch Deutsch-Esperanto« de Liebeck ktp.

ISAE publikigas trimonatan Bultenon, kiu estas ankaŭ organo de la »Sekcio de Teknikaj Vortaroj«. Ĝi entenas artikolojn pri diversaj temoj, kaj plej ofte tradukojn. En ĝi aperis »Scienca Fundamenta Esperanta Terminaro« de Rollet de l' Isle, kiu entenas ĉiujn sciencajn vortojn jam uzitajn de E-istoj, kaj kiuj rilatas al

elementaj konoj de ĉiuj sciencoj.

Pliĉe aperas de kelkaj jaroj »Scienca Gazeto« publikigita en Usono, kiu donas diversajn artikolojn kaj sciencajn sciigojn.

ROLLET DE L' ISLE.

Scott (skot) Herbert Moore, usonano, advokato (ĝis 1926 muzikinstruisto). Nask. 19 aŭg. 1884 en Moundsville, West Virg. E-isto de 1906. Konsilanto ĉe fondaĵo de EANA, 1908, ekzamenestro diversajn fojojn. Kunlaboris al »La Revuo«, 1908—14; »The E Monthly«, kunlaborinto aŭ kunred. de »Amerika E-isto« post 1907. En 1928 eldonis »Filatelan Terminaron« (E, angla, franca, germana). Nun verkas Praktikan Konkordancon de Klasika E, ampleksanta ĉiujn verkojn de Z, Kabe kaj ĉ. 60 aliajn ĉefverkojn.

Scougal (skugl) Andrew Edward, skoto, ĉefinspektoro de lernejoj kaj kolegioj en Skotlando. Nask. apr. 1846, mortis 4 nov. 1916. Prez. de Skota EF kaj de Edinburgha ES. Varme propagandis la enkondukon de E en la lernejojn.

Sebert (seber) Hippolyte, franco, generalo kaj scienculo. Nask. 30 jan. 1839 en Verberie (apud Compiègne), mortis 23 jan. 1930 en Paris. — Ofiĉiro de kolonia artilerio, sendita en Nova-Kaledonion, faris tre valoran esploradon de tiu kolonio kaj organizis la ekspluatadon de ĝiaj arbaroj. Post la franca-germana milito de 1870, li ludis gravan rolon en la kreado de nova artileria materialo. Li fondis kaj direktis la Centran Laboratorion de la Maristaro kaj la eksperimentan kampon de Sevran-Livry, por provado de la pulvoj. Li partoprenis en la kreo de la senfuma pulvo, kaj en la perfektigo de torpedoj. Li kreis multspecajn aparatojn, kiuj ebligis la determinadon de la balistikaj leĝoj kaj aliaj kondiĉoj de la uzado de la artileria materialo. Pri tiuj sciencaj eksperimentoj li publikigis multajn verkojn. — En 1890, pensiiĝinto, li sin dediĉis plene al sciencaj kaj industriaj laboroj. Farigis direktoro de la artileria fako kaj poste prez. de la tre grava Societo »Forges et Chantiers de la Méditerranée«, kaj konsilanto de aliaj industriaj societoj. En

1881, ĝen. sekr. de la fama Kongreso por Elektro, kiu komencigis en Francujo la gravan movadon por elektro industria. Prez. de multaj sciencaj societoj. En 1896 membro de la Sciencia Akademio. — Krome li tariĝis, en la sciencaj medioj, kuraĝa porbatalanto de du aferoj, kiuj alportos al la intelekta progresado de la homaro gravan helpadon: sciencia bibliografio kaj E. — Li diskonigis la »Universalan Bibliografian Repertorion«, per kiu la ellaborajoj de la homa penso estas metataj je la dispono de ĉiuj. Prez. de la Bibliografia Instituto de Bruxelles, fondis kaj direktis ĝian Parizan filion. — E-iĝis en 1898, esplorinte por trovi por la Bibliografio la plej taŭgan int. lingvon, kaj ĝis sia morto li senlace penadis por konigi kaj defendi ĝin. En 1901 li legis raporton pri ĝi en la Sciencia Akademio, kaj ĉiam klopodis en tiu Societo, preparante la efikan agadon de Rollet de l' Isle. En 1905 li fondis kun Javal la E-istan Centran Oficejon, vastan organismon de int. propagando, de defendo de E-istaj Institucioj kaj de instruado (v. Chavet). Ne nur li ne ŝparis tempon kaj laboron, sed li dediĉis por tiu celo tre gravajn sumojn, kaj estis mecenato de E. — De la kreo de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, li prezidis kaj direktis tiun organizon, kaj ĉeestis preskaŭ ĉiujn Kongresojn. — Varbis multajn scienculojn, kaj kreis kaj prezidis du jarojn la Int. Scienca Asocion. — Apud Z, Sebert estas la homo, kiu per sia fortega personeco plej multe faris por la sukceso de nia movado. — Krom artikoloj aŭ raportoj aperintaj en »Oficiala Gazeto«, kaj en diversaj E-aj gazetoj, li publikigis france bonegajn broŝurojn pri E. L. BASTIEN.

Segaŭa Sigenori, japano, prof. de angla lingvo en kvara nacia kolegio, Kanazawa. Nask. 22 feb. 1897 en Kanazawa-si. Sukcesis akiri premion ĉe lit. konkurso por E knaboj de »La Revuo Orienta«. Prez. de Hokuriku EF. Prez. de XVIII-a J E-Kongreso. Ĉeestis UK en Antwerpen, 1928.

Se Grenereto... Originale de Kelnm Robinson. 1930, 158 p. »Tre sprita, ofte satira, inklina al novemo,

kun rigardoj al E-ista vivo kaj literaturo. La ironiaj rakontoj de la unua duono estas pli perfektaj, ol la historio, kiu okupas la alian parton. Atentinda verkajo.« (G. S., »E«, 1930, p: 182.)

Seidl (sajdl) Ferdinand, aŭstria germano, laŭ konvinko kosmopolito, komerca oficisto kaj ĵurnalisto. Nask. 19 aŭg. 1901 en Wien. Artikoloj kaj poemoj en turismaj gazetoj. Red. de »La Socialisto«, kunlaboranto de »Sennaciulo«. Mortis en 1934.

Sekretaj Sonetoj. »Al gefianĉoj kaj junaj geedzaj por instru kaj instigo«. Originale de Peter Peneter. 1932, 96 p., kun ilustraĵoj. Erotika verko, »sovaĝruĝa ciklo«, kiu pentras »la ardan amon trans ĉemizo.« Aldone: »komplezaj klarigoj«, kvazaŭ erotika faka vortaro. Senriproĉa lingvo, tre bona verstekniko.

Seksa reformmovado. Plej gravaj postuloj de la Universala Ligo por Seksa Reformo estas: liberigo de la geedzeco kaj de la eksedziĝo de eklezia kaj ŝtata kuratoreco, reguligo de nasko en senco de respondeca infanproduktado, eŭgenika influo al la posteularo, ĝusta prijuĝo de interseksaj varioj, seksa punleĝo punante nur efektivajn atakojn al la seksa libereco, laŭmetoda seksa edukado kaj klerigado, ktp. La ligo uzas E-n kiel oficialan lingvon apud la ĉefaj lingvoj, fama seksologo d-ro J. H. Leunbach dum la kongresoj de la ligo parolis E-e. Unu el la fondintoj de la Ligo, A. Forel estis amiko de E.

Sekspsikologio. Originala studo de S. Ziegler. SAT, 1926, 54 p. »Nova sistemo sintezi per kurboj la sinksekan evoluon de l' diversaj elmontoj de l' sekseco dum la vivo. Tro konciza priskribo«. (G. S., »E«, 1926, p: 181.)

SEL: Skolta E-ista Ligo. (v. Skolta movado.)

Seleznjov (seleznev) Ivan, ruso. Mortis en 1904. En 1902 pere de E li vojaĝis tra Bohemujo kaj Francujo kaj la unua pravis al Parizanoj, ke E povas esti parolata kun la sama facileco, eleganterco kaj rapideco, kiel iu ajn nacia lingvo. Kune kun Ĉejka kaj Krumpholt li fondis en 1902 kaj redaktis »Revuo Int«. Li kunlaboris

en multaj E-gazetoj, tradukis »Bolesĉjo« de Gorkij. (v. pri li la artikolon de Bourlet en BIL, p: 307.)

Selzer (selcer) Bernhard, aŭstriano, privata oficisto en Wien. Nask. 1902 en Podwoločyska (nun Polujo). E-isto de 1922. Sekr. de AED, 1929. Trad. »La mortado« de Nothnagel, 1930; »La juda ŝtato« de Herzl; kaj »Anhelli« de J. Slowacki (manusk.).

Senalkhola kultura. Sociaj, sanecaj, etikaj-moralaj kaj religiaj, ekonomiaj kaj aliaj motivoj klarigas la laboron por la savo de la alkoholmalsanuloj (drinkemuloj). Ĉefaj rimedoj: eduko de la junularo, torigo de la trinkkutimoj, progresigo de la senfermenta fruktutiligo, kreo de senalkoholaj societa vivo kaj kulturo ktp. Al la diversmaniere organizita movado E prezentas rimedon, plifaciliganta int. interrilatojn, kunlaboron, inform-kaj gazetservon. — Jam en 1911 laŭ alvoko de sanitar konsilisto d-ro Karl Briegleb, Worms, estis fondita »Tutmonda E-ista Bontemplana Asocio« (TEBA); prez. fariĝis la iniciinto; sekr. A. W. Bodger. Antaŭe jam ekzistis (ne plu laŭ detaloj konata) E-ista kontraŭalkohola societo, kiun prezidis rektoro Boirac, Dijon. Oficiala organo de TEBA estis »La Bontemplano«, aperinta ĉe A. Stark, Magdeburg de 1908 kiel aldono al »Germana E-Gazeto«. La ĝis 1920 du-semajnan, de 1911—12 semajnan gazeton, plej ofte 8-paĝan, laŭ formato 14×21, redaktis G. Brockhot, Bomlitz, kiu de 1913 eldonis kaj redaktis novan oficialan gazeton (E kaj germanlingvan) »La Int. Abstinenta Observanto«, 8-paĝan, 15×22 formatan, favoratan de la tiama mondmilito montriĝis, precipe en Balkanaj, Baltikaj kaj Skandinavaj landoj, ĝojiga vigliĝo. Laŭ tio la partoprenantoj de la fakkunveno de la abstinuloj dum la 21-a UK en Budapeŝt 1920, decidis la fondon de »Int. E-ista Laborkomitato por senalkohola kulturo« (IELK p.s.a.k.) kun prez., samtempe del. por Nederlando A. Bramkamp-Weber, Scheveningen, sekr. del. por Aŭstrio, W. Mudrak, Wien. IELK (poste nomita IEL Komunumo) disvastigas

E-n inter tutmonda abstinularo, servigas E-n al la int. kontraŭalkohola movado, helpas kunigon de ĉiuj samcelaj fortoj kontraŭ la alkoholkapitalismo, IELK, helpe de siaj delegitoj, precipe de d-ro A. Skatariĉ, Zagreb, instruistoj J. Jödal, Holbäk, F. Ahnfeldt, Torskors, B. Gluchowski, Warszawa; J. Polaček, Breĉlav, Wr. Chandler, Sidney, instigis kaj aranĝis kursojn de E, aperigis artikolojn por E kaj per E-ajn tekstojn, raportojn (tradukojn) en la nacilingva fakgazetaro, klopodis por E ĉe landaj kongresoj, partoprenis ĉe ekspozicioj ktp. — Inter bontemplanoj laboras por E precipe Werner, f-ino G. Spiess, Danzig, d-ro K. Briegleb, Worms, majoro Watson, Letchworth, Anglujo (mortis en 1932), prof. d-ro J. Longo, Mödling k. a.; ekzistas E-rubriko en la oficiala int. organo, E-kursoj en landaj gazetoj; fincelo estas restarigo de TEBA. — En IELK kunlaboras ankoraŭ d-ro St. Kadiev, Slivan, Bulg. A. Kurmis, Riga, F. Roose, Brügge, s-ino A. Berger, Wien, »La Juna Batalanto«, Luxembourg, K. Nohara, Chofu, Jap., R. Banham, Melbourne. Organon de IELK anstataŭas cirkueroj kaj publikigoj en la jarkura E-gazetaro. IELK kunlaboras laŭeble kun parencaj movadoj, precipe kun la movado por sentabaka kulturo, vegetara, porpaca, ktp.

Literaturo. »La alkoholdemando«, la fama verko de d-ro Bunge, trad. de Briegleb, en »La Bontemplano« 1912. »Grava popolhigiena kaj socia demando«, originalo de H. Salokannel, 1926; plue presajoj, varbfolioj. W. MUDRAK.

Senbedaŭre amo rabas. De Ariŝima, el la japana trad. Tooguu. 1931, 103 p. »Tiu ĉi profundanaliza libro atestas pri renkontiĝo de l' orienta kaj okcidenta penso. Iom peza stilo.« (Totsche, L. M., 1932, p: 96.)

Senior (sinjor) Watson, anglo, mezurilinspektoro en Edinburgo. Nask. 7 febr. 1868 en Dewsbury. Prez. de Unuigita Soc. de Inspektistoj de Peziloj kaj Mezuriloj. E-isto de 1910. Prez. de ES en E.

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) Tutmonda organizo de lab. E-istoj,

celanta praktike utiligi E-n por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda. Fondita en 1921. (v. Laborista movado.) BRUIN.

Sennacieca Revuo. Klasbatala gazeto, fondita en 1921. (v. p. 182; v. Laborista movado.)

Sennaciismo. Tiu tendenco en la laborista E-movado naskiĝis en la kadro de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). La nova ismo restis dum pluraj jaroj ne precize difinita kaj iuj rilatis al ĝi proksimume kiel al la malpreciza »interna ideo« de Z. Iom post iom la kompreno pri S. formuliĝis per artikoloj de E. Lanti en la organoj de SAT (artikoloj plejparte represitaj en »Vortoj de k-do Lanti« kaj ampleksantaj 23 paĝojn de la libro). En 1928 la aŭtoro publikigis broŝuron: »La Laborista E-ismo«, en kiu unu tuta ĉapitro estas dediĉita al la difino pri la nova termino. Ĝis tiam, en la senpartieca organizo, la S-a tendenco ne renkontis kontraŭstaron. Sed en 1929 okazis krizo en SAT kaj la S. fariĝis en la manoj de la opoziciuloj iia ĉiama argumento por ataki ties gvidantojn. Tiuj opoziciuloj asertis, ke la S. estas primumerisma kaj sekve »kontraŭrevolucio«. Tiu, subita, neatendita atako havis kiel rezulton, ke Lanti en 1931 aperigis anonime 3000 ekzemplere broŝuron: »Manifesto de la Sennaciistoj«, kiu poste estas tradukita en kelkajn lingvojn kaj jam aperis en 2000 e-roj en franca lingvo. En tiu Manifesto troviĝas jeno, kiu iel povas pravigi la riproĉojn de la pure marksistaj Internaciistoj: »Kio karakterizas la S-n, tio estas ĉefe ĝia agnosko pri la grandega rolo, kiun ludas en la mondo la artefaredo. Tia kapablo fari el la homo la reĝon super la aliaj animaloj. La homo adaptas la naturon al si, dum la besto devas adaptiĝi al la naturo. La sennaciistoj sekve ne neas la grandan forton, kiu kuŝas en la volo de l' homo. Ili sendube scias, ke li ne povas liberiĝi el sia propra pezo, aŭ salti for de sia ombro. Tamen la limigita spaco, sur kiu agas la homo, estas relative larĝa. Lia volo sekve povas fari grandajn verkojn. Tial ni kredas, ke la »fatalaj leĝoj« de la historio estas nur

relativaj.« La plia sekva cito pli precizigas komprenon pri la nova ismo: »La sennaciistoj batalas kontraŭ ĉio nacieca; kontraŭ naciaj lingvoj kaj kulturoj; naciaj kutimoj kaj tradicioj. Por ili E estas ilia ĉefa lingvo kaj la naciajn ili konsideras nur kiel helpajn. Ili rifuzas partopreni en iu ajn nacibatalo kaj agnoskas kiel necesan kaj profitdonan al la ekspluatata klaso nur la klasbatalon kun la celo forigi la klasojn, la naciecojn kaj ĉian ekspluaton.« (Sama verko.) Tial ke la hereza doktrino trovis kontraŭstaron en SAT, la sennaciistoj grupiĝis en »Frakcio« ekster la de ili tamen fervore subtenata organizo kaj eldonas pli-malpli regule la »Sennaciistan Bultenon«.

Laŭ SAT-fontoj.
Sennaculo. Klasbatala gazeto, fondita en 1924. (v. p. 182; v. Laborista movado.)

Senŝtatanoj. (Anarkiistoj.) En 1924 kelkaj anarkiistaj SAT-anoj, kiuj opiniis, ke SAT estis tute sub influo de la Komunisto Internacio kaj ne prezentis al ili sufiĉe da eblo por propagandi siajn ideojn, starigis propran organizon, la Tutmondan Ligon de E-istaj Senŝtatanoj (TLES). Ĉe ĝia starigo ke kaj anarkiistaj SAT-anoj transiris al ĝi. En la postaj jaroj tondiĝis TLES-grupoj, i. a. en Amsterdam, Berlin, Lyon, Mannheim, Paris, Stockholm. En 1925 TLES eldonis monatan gazeton »Libera Laboristo«, kiu aperis malregule kaj mortis en 1931. TLES ne akiris multan influon. Ŝajne la nombro da anarkiistaj E-istoj ne estas sufiĉe granda por bone viviĝi propran organizon.

Laŭ G. P. de BRUIN.
Sentabaka kulturo. La tiucala movado pro sanecaj, sociaj, ekonomiaj, k. a. motivoj propagandas kaj progresigas tabakabstinencon, precipe inter junularo kaj protektas la nefumantojn. Al ĝi utilas E por int. kunlaboro kaj informservo. »E-ista tabakkontraŭula asocio«, de 1929 nomita »Verda Kruco, laborokomunumo por S. K.« estas fondita dum la UK en Wien, 1924, laŭ instigo de d-ro A. Hloucha, Wien kaj W. Mudrak, elektita afergvidanto. Kunhelpis ĉefe: M. T. Gueritte, s-ino E. L. Osmond, prof. F. Grimm, E. Koblische, B. Gluchowski,

R. Horner (mortis en 1927), O. Büne-mann, d-ro I. Joó, E. Urbach, A. Neupert («La Junularo»), »Libero«. La Verda Kruco havas geinteresulojn en proks. 20 landoj, ĝia adreso: Wien, I., Judenplatz 8. Dum la V-a kaj VI-a Int. Kongresoj kontraŭ Tabako en Praha, 1927, kaj Paris, 1929, estas aranĝitaj referatoj en kaj per E. La ĝenerala faka movado gajnis anojn alie ne atingitajn kaj taŭgan materialon por la nacilingva fakgazetaro. Literaturo: »Verkfolioj por S. K.«, »La tabako kaj la juna idaro« (de Grimm), ambaŭ elĉerpijaj.

W. MUDRAK.

Sentiŝ (santi) Henri, franco, d-ro de scienco (1897), prof. licea de fiziko. Nask. 12 dec. 1850 en Paris, mortis 15 dec. 1933 en Grenoble. E-isto de 1893, gvidis kursojn, faris prop. broŝurojn, kreis la E-grupon en Gr. kaj kunlaboris en E-aj gazetoj. Verkis: »Urso«, novelo, 1906; »Blua Kardo«, 1923, ktp. kun reformemaj tendencoj. Li bataĵis por »racia evoluo de E«, ĝis sia morto li eldonis revueton »E-a Evoluo«, kies celo estis enkonduki kelkajn ŝanĝojn en la lingvon.

Seppik Henrik (Allari), estono, E-instruisto. Nask. 9 febr. 1905 en Pärnu. Okupoj pri turismo. E-iĝis 1920. Multaj kursoj en Tartu, Tallinn, Pärnu kaj Petseri 1924—28. Dum pluraj jaroj estrarano de E-societoj. Lektoro de E en la popola universitato en Pärnu, 1924 kaj en Tartu, 1928. Cseh-metoda instr. kaj prop-isto en Svedlando, 1929—31, en Norvegujo, 1932. Fond. kaj prez. de la estona E Turista Komisiono. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Scp Rakontoj. Originale verkitaj de Ivan Malfeliĉulo. 1906, 74 p., dua eld. 1903, 96 p. »En plena konfido ni rekomendas ĝin por la bon-egaj studadoj enhavataj pri la rusa vivado.« (British E-ist«, 1906, p: 17.)

Seplveda Cuadra Luis Enrique, (ps.: Luensecua; Luiso Vidinte), ciliano, instruisto de blinduloj kaj tradukisto de la lingvoj franca, angla, itala kaj portugala al la hispana. Nask. 9 okt. 1873 en Valparaiso. Fondis la unuan societon de E, red. la unuan prop. gazeton en Ĉilio. Prez. de la unua landa kongreso de E, San-

tiago, 1910. Fondis en 1932 junularan ES. Verkis kelkajn prop. broŝurojn, tradukis la literaturajn »Por Koleriĝi« (23 p., 1910, Meksiko). Kunlaboris por multaj E-gazetoj.

Ser.ŝev Inocento, siberiano, ruso; grek-ortodoksa pastro, pedagogo, »E-isto«. Nask. 15 aŭg. 1883 en Kudara. De 1906 ĝis 1917 laboris kiel pastro en Siberio, okupis sin multe pri popololeduko. Dum cara reĝimo sidis en la malliberejo pro politika akuzo kaj Sovetion li forlasis »pro ruĝa despotismo kaj arbitro«. Tri jarojn loĝis en Japanujo, esploris la japanan eduk-sistemon, por kio piede vojaĝis 200 mejlojn. Nun loĝas en Sidney. E-isto de 1910. Unu el pioniroj de E en Siberio. En 1910 faris kune kun sia fratino (Varvava S.) rondvojaĝon tra 13 landoj de Eŭropo per E. Ĉiam, ĉie kaj ĉiel li propagandis E-n; multaj paroladoj, artikoloj, prop. broŝuroj kaj kursoj. Ĉiuj familioj estas E-istoj. Kunlaboris al »Int. Socia Revuo« kaj aliaj E-gazetoj. Aperigis 250-paĝan verkon pri »Siberio« (originalaj kaj traduki.aj verkaĵoj), 1914, kaj du cent-paĝajn volumojn de revuo »Oriento«, Harbin, 1925. Ampleksaj originalaj kaj trad. verkoj en manuskripto.

Ser.ŝeva Varvara N., sovetiano, rusino, fratino de la antaŭa, instr. Aŭtoro de rimarkinda porinfana E-lernilo »Verda Steleto«, 1926.

Servokapabla! Marcus Tybout. Du noveloj de Eekhoud, el la franca trad. Bergiers. 1927, 70 p. »Amo al la suferantoj kaj mizeruloj. La tradukanto havas fluan stilon. Li tro, eĉ misuzas afiksojn.« (R. Göndör, »L. M.«, 1931, p: 70.)

Ses Noveloj de Poe, el la angla trad. A. F. Milward, 1924, 80 p. Prenitaj el »Rakontoj de mistero kaj imago«.

Setälä (setele) Vilho Suonio (ps.: kelkfoje Vilho Suonio), finno, redaktoro kaj fotografisto. Nask. 4 apr. 1892 en Helsinki; gepatroj: prof. d-ro E. N. Setälä ŝtatkonsilanto kaj verkistino Helmi Krohn. Filozofia magistro, 1922, fakoj: fiziko, kemio, matematiko. Eniris en la servon de eldona akcia societo Otava, 1922, kaj red. i. a. praktikan enciklopedion de hejma tekniko kaj arto, verkis manlibron de

fotoartisto. E-istiĝis en 1907, aktive aliĝis al la movado en 1911. Multaj kursoj kaj paroladoj. Sekr. de EAF 1918—22, del. de UEA de 1912, nun ĝia komitatano. Membro de la Akademio. Dir. de EIF de ĝia fondo, 1920. Ĝenerala sekr. de la XIV-a UK Depost 1917 ĉefa gvidanto de la movado en F. Verkoj: »E-a legolibro«, 1917, aperis 4 eldonoj en 18.800 e-roj; »Klariga Vortaro por Finnoj«, 1917; »Lernogvidanto de E«, 1919; »E-F Vortaro«, 1919; »Plena Vortaro F-E«, 1923; »E-kurso finna«, 1925 (aperis ankaŭ en sveda kaj estona lingvoj). La eldonnumero de liaj finnaj lerniloj entute estas 56.200 e-roj. Tradukis novelon de Linnankoski, 1919.

SEU: Sovetrespublikara E-ista Unio. v. Ruslando.

Sevak Gurgen (familia nomo: Grigorjan), sovetiano, armeno, lingvisto. Nask. 15 apr. 1904 en Tiflis, Kaŭkazo. En la Univ. de Erivan li gvidas la katedrojn de armena lingvo kaj metodologio de lingvoscienco; docento. E-isto de 1921. Multaj prelegoj, kursoj, artikoloj en Tiflis ĝis 1924, poste en Erivan. Organizo de Armenuja E-ista Unio, 1925 kaj ĝia prez. Sekr. de Armenuja komitato de SEU. Membro de LK kaj de Lingva Komisiono de SEU. Verkis lernolibron por armenoj, 1930, tradukis por HDE kaj SR. Romanoj, dramoj, versoj en manuskripto.

Sevenhuijsen (sevenhojsen) Jan Willem, nederlandano, lernejestro. Nask. 3 sept. 1858 en Bronwershaven, mortis 10 febr. 1923. Prop-isto en instr. rondoj. Prez. de TAGE kaj la Vegetara Ligo E-ista, estrano de loka grupo. Reprezentis la ministron de instruado en la 12-a kaj 13-a UK. Aŭtoro de lernolibro por infanoj kaj de bildkartoj klarigantaj la gramatikon.

Severn Walter, anglo, instruisto. Nask. 26 apr. 1883 en Worcester. Dum multaj jaroj laika predikanto en la anglikana eklezio. Predikis ĉe tri BE Kongresoj. Oficiale instruas E-n en ŝtata lernejo. La reĝa inspektoro raportis en 1921 por celoj de la Ligo de la Nacioj pri lia lernejo: »La infanoj en Worcester korespondas kun 27 landoj... La instruistoj diras, ke

la infanoj parolas pli bone, skribas pli bonajn verkaĵojn kaj pli kapablas sekvi la komplikan analizon de la angla gramatiko. La inspektoroj, kiuj vizitis la... lernejojn, konfirmas tiun konstaton.« Verkis multajn artikolojn kaj poemojn.

SFPE: Societo Franca por la Propagando de E. v. Francujo.

Sharpe (ŝarp) Richard (ps.: Roŝo), anglo, komercisto. Nask. 31 dec. 1844 en Paris, mortis 1 aŭg. 1923 en Coggeshall. Lerta lingvisto, kosmopolito vojaĝinta en 14 landoj. E-istiĝis en Buenos Aires, 1906. En 1913 eldonis: »Travivaĵoj de Ro Ŝo«. Li estis »ĝisoste« fidela al Z-a E. Liaj lingvaj konsilioj estas aprobitaj de Z kaj flanke de la »Lingvaj Respondoj« meritas studon ne nur de aliaj »ĝisostuloj«, sed ankaŭ de ĉiu, kiu celas bonan stilon. M. C. B.

Shaw (ŝo) Francis William, anglo, inĝ. Nask. 19 apr. 1873 en Manchester. E-istiĝis 1909. Iama sekr. de Coventry ES.

Siba (ŝiba) Teikiti, japano, verkisto, deputito. Nask. 17 aŭg. 1869 en Hukui. Kunfondinto de JEA, 1906. — (Kuw.)

Siedl (sidl) Ludwig, aŭstro-germano, kalkulkonsilisto de la komunumo Wien en pensio. Nask. 23 nov. 1879 en Voitschlag, mortis en majo 1934. E-isto de 1914. Dum la milito prop-isis E-n tiel en la tranĉeo, kiel malantaŭ la batalkampo. Postmilito kelkan tempon estrano de AKLE. Nun vicprez. de Katolika UE en Wien. Gvidis multajn kursojn por junuloj, tramistoj, policistoj, instruistoj, virinoj k. a. Kurso en la Viena ĵurnalo »Volks-Zeitung«, kiu en E-angulo publikigis E-ajojn de li kaj de lia edzino (Christine); artikoloj de ili ankaŭ en »Aŭstria E-isto«, ktp.

Sievers (sivers) Hans, germano, eksministro, eksparlamentano, socialdemokrata. Nask. 25 febr. 1893 en Hamburg, nun loĝas en Köbenhavn. E-isto de 1909.

Sifo ĉino, verkisto, la unua anarkiisto en Ĉinujo. Nask. 1884 en Canton, mortis pro maliĉeco, neflegita dum la malsano 27 marto 1915 en Shanghai. Partoprenis de sia junaĝo politikan revolucion por renversi la Man-

chu-dinastion. Bombatencis Manchu admiralon en Canton, 1907; malsukcesis; perdis sian maldekstran brakon; en malliberejo dum 3 jaroj. Multe verkis. Helpis sukcesigi la revolucion; rezignis altan ŝtatificon; sin turnis por socia revolucio. Adepto de la doktrino de Tolstoj kaj Kropotkin. Fondis »Konsciencan Grupon« kun vivreformaj principoj. (vegetara, senservista, senedzeca ktp). E-isto de 1912. Kunfondinto de EA en Shanghai. En 1913 eldonis ĉiusemajnan ĉinan E-gazeton »La Voĉo de la Popolo«. Fariĝis mem red., kompostisto kaj presisto kaj predikis anarkiistan komunismon.

Sigelmarkoj. Por fermi la leterojn oni uzas la glumarkojn aŭ sigelmarkojn. La kolektado de glumarkoj estas agrabla pasio, ĉar inter ili ekzistas veraj perloj de la malgranda gratiko. Plej ofte la glumarkoj aperas en diversaj koloroj kaj sur diverskoloraj paperoj, kun dentumita aŭ tranĉita rando. La glumarkojn la kolektantoj surgluas kiel la poŝtmarkojn en albumojn aŭ sur egalajn paperfoliojn (kartonojn), ĉar tie ili pli efikas. Inter la glumarkoj oni distingas 2 ĉefgrupojn: a) glumarkoj kun dato; b) glumarkoj sen dato. La unua grupo estas pli valora kaj havas pli multajn kolektantojn ol la dua. — La glumarkojn kun dato oni kutimas aranĝi laŭ datoj kaj urboj. Ekz.: 1906 Genève, Paris, Reichenberg, Wien; 1907 Antwerpen, Berlin, Budapest, ktp. Oni povas aranĝi ilin ankaŭ laŭ grupoj (int. kongresoj, naciaj kongresoj en aboca vico, foiroj fakaj kunvenoj, ktp.), sed la laŭjara divido estas pli bona, ĉar tiel la serĉita glumarko estas pli facile trovebla. La unua glumarko kun dato aperis en 1906 por la 2-a UK. Ĉe kelkaj kongresoj la eldonita nombro de la diversaj glumarkoj estas grandega. Ekz. 1917 Girona 156, 1920 Barcelona 209. La nombro de la glumarkoj kun datoj ĝis nun atingis 1700.— La glumarkojn sen dato oni povas dividi jene: 1. propagandaj; a) naciaj laŭ aboca vico, b) multlingvaj, c) E-lingvaj; 2. glumarkoj de firmoj, librovendejoj; 3. de gazetoj; 4. de libroj; 5. de urboj; 6. de

komercaj; 7. de societoj, grupoj; 8. de personoj; 9. de Z; 10. helpmonoj; 11. la ceteraj simplaj glumarkoj, kiujn oni denove povas dividi laŭ formato jene: a) kvinpintaj; b) rondaj c) elipsoformaj; d) triangulaj; e) kvarangulaj; f) kvinangulaj; g) sesangulaj; h) brikformaj: I. vertikalaj kaj II. horizontalaj. La nombro de glumarkoj sen dato estas pli ol 2000.— En »Germana E-isto«, 1912 aŭg.—dec., »Normanda Stelo«, 1913—14, kaj en »E Kolektanta« aperis parteto de katalogo pri glumarkoj. D-ro Möbusz akiris tie multan meriton. En »Tutmonda Kolektanto«, 1931 n-ro 6. aperis listo de glumarkoj kun dato, kaj katalogo pri tiuj glumarkoj de d-ro Jozefo Takács estas jam prespreta. J. TAKÁCS.

Silbernik Aleksandro, hebreo, bofrato de Z. Mortis 27 marto 1906 en Varsovio. Ne estante riĉa homo (en Kowno-Kaunas li havis saĝfabriketon, en kiu li persone laboris ĝis la 74-a jaro kaj ŝarĝita de granda familio: 9 gefiloj) li ebligis al Z eldoni la unuajn broŝurojn pri E. Ankorau dum 15 jaroj monhelpis sian bofilon. Malgraŭ la maljuna aĝo li tute ellernis E-n.

Silbernik Joseph, usonano, bofrato de Z. Mortis 30 aŭg. 1925. Longan tempon estis ĉefdelegito de UEA en New York.

Silva Etelvina, portugalingo. Nask. 2 jun. 1855 en Lisboa. Parolas ses lingvojn. Laboris multe en Lisboa ES, al ŝi oni dankas la sukceson de E-festo en La Nacia Teatro (1918), kiun ĉeestis la respublika prez.

Silva Venancio, brazilano, d-ro, kuracisto. Hon. vicprez. de BLE. Bona oratoro. Tradukis al E »Parizino« kaj »Manfredo« de Byron.

Silvestriev Ilia, bulgario, subkolonelo de la armea rezervo. Nask. 25 marto 1883 en Plovdiv, loĝas en Ŝumen. Propagandis senlace, gvidis multajn kursojn, aplikis unua la rektan instrumetodon en E kursoj en B. Estis prez. de BEA en 1908—10 kaj en 1928—30.

Simeonov Dimitr, bulgario, oficisto. Nask. 7 aŭg. 1898 en Gradec, loĝas en Sofia. Kiel sek. de la enlanda organizado de 1921 ĝis 1924 plifortig-

is ĝin finance kaj helpis multe per la vasta diskresko de la movado. Kapabla organizanto, sindona aganto. Agis aparte por E en vegetaranaj rodoj.

Simon Otto, aŭstro-germano, prof. por matematiko kaj fiziko ĝis 1907 en Ung. Hradisch, poste en la Nova Komerca Akademio en Wiena; nun pens. Ĉ-isto de 1902 post legado de franca revuo de Ch. Méray. Faris pioniran laboron en Aŭstrujo; multaj kursoj, artikoloj kaj paroladoj. Estis ĉiama membro de Germana EA (ekde la fondiĝo en 1904); pro samdirektiĝo Hitler-a li eksiĝis en 1933. Fondinto de la Ligo de Germanlingvaj EG en Aŭ., 1908. Post la milito gvidanto de la laborista E-movado, estis prez. de ALLE, 1924—33. Ano de la ŝtata ekzamena komitato de 1925. LK ekde 1905. Kunklaboris je L. I., »La Revuo«, »Marto«, »Tra la Mondo«, »Danubio«, »Germana E-isto«, »Informaj Raportoj«, »La Socialisto« (kies eldonanto li estis). Aŭtoro de prop. broŝuro, 1911, Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Simonyi (simonji) Zsigmond, hungaro, d-ro, univ. prof. lingvisto. Nask. 1853 en Veszprém, mortis 22 nov. 1919 en Budapeŝt. Vicprez. de Prop. Komitato por L. I. (1918—19). Klopodis enkonduki E-n en la Universitaton. (I. »H. E-isto«, dec. 1919.)

Simose (si-) Kentarō (-roo), japano, kuracistoĉefo de J-a armeo. Mortis. En 1890 lernis Volapükon kaj en 1892 E-n. Dua J-a E-isto. — (Kuw.)

Sinc'air Up'on - romano : Jimmie Higgins. El la angla trad. K. Fröding. 1934, 372 p. »Longa, klasbatala romano, kies komenco iom tedas pro tro seka politikajo sed kies ĉiu ĉapitro pli kaj pli absorbas... Temas pri la poioma kontraŭvola evoluo de malpatriota usona laboristo al fervora frontsoldato, kiu tamen ene ĉiam retenas siajn idealojn. Ĝi donas instruajn bildojn pri la tiamaj konfliktoj en Usono inter militistoj kaj pacifistoj.« (The British E-ist, sept. 1934.)

Sinha Lakṣmīswar, h.ndo, instruisto de ped. manlaboroj en Santiniketan, Bengalio. Nask. 6 jun. 1905 en Rarisal, Orient-Norda Hindujo. Sendita al Svedujo en 1928—29 studis

la pedagogian slojdon. En 1928 dum restado en Stockholm fariĝis E-isto, faris ĉiujn ekzamenojn de SEI. Laŭ iniciato de E. Malmgren en sept. 1929 komencis prelegvojaĝojn. En Svedujo li veturis pli ol 10000 kilometrojn, faris pli ol 200 prelegojn antaŭ ĉ. 30000 homoj, dufoje ankaŭ en radio. (L. detalojn en Jubilea Matrikulo« de SEF) En aŭtuno 1930 rondvojaĝo kaj prelegoj en Estonujo kaj Latvujo. (Detaloj en HDE.) Poste dum du monatoj prelegvojaĝo en Polujo: 40 prelegoj en 22 urboj antaŭ ĉ. 8000 p. En aŭg. 1931 devis reveni en Hindujon, kie laboris por E pere de artikoloj, fariĝis ĉefdel. de UEA. En aŭtuno 1933 venis denove en Svedujon. Verkoj: »Sivaĝi.« originala historia drameo, 1928 »Bengalaj fabeloj« 1930; kaj broŝuro pri interhoma interkompreno, 1931.

Sinjoro Lai data. Kompilis Niŝimura. 1932, 200 p. Dediĉaĵoj apudpaĝe kun japanlingva traduko, okaze de la liberigo de O. Deguĉi (v.) kaj je la festo de lia atingita 60-a vivjaro, verkitaĵe de diverslandaj E-istoj.

Sinjoro Tadeo aŭ lasta armita posedopreno en Litvo, pola epopeo. Verkis A. Mickiewicz en 1824, trad. al E Grabowski. 1918, VIII. kaj 304 p. Majstra priskribo de la pola nobelaro. »Elektinte unu el la plej karakterizaj pecoj de la pola literaturo, li liveras al ni mirindan ĉefverkon. Traduki ĉi tiun dekmilversan poemon estis titana laboro. G. povis liveri fidelan tradukon de l' originalo, ĝin sekvante preskaŭ laŭverse.« (N. K., »L. I.«, 1914—20, p.341.)

Sinjoro Vento kaj Sinjorino Pluvo. De Musset, el la franca trad. Champion. 1907, 123 p., kun ilustraĵoj. »Ĉarma rakonto. Facila stilo.« (L. I. 1907, p.284.)

Sinmura Iduru, japano, prof. de lingvoscienco ĉe Imperia Univ. de Kyoto. Lia grava studo: pri etimologio de japanaj vortoj. Membro de J Imp. Akademio. Ĉeestis la 4-an UK en Dresden. Prezidis la 13-an JE Kongreson.

Sinpak Au, ĉino, licenciato de filozofio, prof. Nask. 1892 en Canton. Studis en Lyon, Francujo, 1922, revenis en Canton, 1925. Ekpropagandis en

Canton kaj Fatshan, 1914, en Peking, 1917. Delegito de Int. Edukista Konferenco, Genève, 1922. Prof. de E en Ku-ang Tung Universitato, 1925. Revivigas la movadon en Canton kun Wu, Hsu kaj Kenn. Dir. de EI, 1928. Fondis gazeton »Kantona E-isto«, gvidis radian kurson, rondiran kurson ktp. Verkis lernolibron. L. K.

Sintakso. Artikolojn rilatantajn al S. oni trovas sub la sekvantaj titoloj: Artikolo, Akuzativo kun infinitivo, Da, Duobla Akuzativo, Kazo post kiel, Kondicionalo, Pasivaj partipoj, Sintaksaj Elementoj, Subjunktivo, Verboj transitivaj kaj netransitivaj, Verbotempoj en dependaj propozicioj, Verbotempoj kompleksaj, Vortordo.

Sintaksaj elementoj. La terminologio de la SE ne estas unuece fiksita. La suba klasifiko estas provo de unuecigo.

Konsiderante la vortojn laŭ ilia speco, oni nomas ilin parolelementoj (substantivo, pronomo, adjektivo, verbo, adverbo, numeralo, artikolo, prepozicio, konjunkcio, subjunkcio, interjekcio).

Konsiderante la vortojn laŭ ilia funkcio en la frazo, oni nomas ilin frazelementoj. Oni distingas la sekvantajn frazelementojn:

1. **Subjekto:** tio, pri kio oni asertas plenumon de ago aŭ havon de stato (voli estas preskaŭ povi; la hundo bojas; ŝia estas pli kara ol najbara; du estas duono de kvar; kiu venis?).

2. **Predikato:** vorto esprimanta agon aŭ staton asertatan pri la subjekto. Ĝi povas esti

a) predikato memstara (la arboj floras),

b) kopulo, kiu bezonas kompletigon (la kampo estas verda; li iĝis soldato).

3. **Objekto:** vorto esprimanta ion, al kio la ago rekte direktiĝas (mi vidis homon).

4. **Adjektivo:** vorto esprimanta la cirkonstancojn, inter kiuj okazas la ago. Ĝi povas esti

a) adverba (ŝi bone fartas),

b) akuzativa (iri Parizon)

c) prepozicia, t. e. enkondukita de prepozicio (li batas per martelo).

RIM. Ekzistas funkcio, kiu povas

esti esprimita jen en formo de objekto, jen en formo de prepozitiva adjekto (oni sciigis tion al li; oni sciigis lin pri tio). Tiam adjekton, kiu estas transformebla en objekton rektan, oni povas nomi nereakta objekto.

La supraj funkcioj (1., 3., 4.) rilatas al la predikato. Al ĉiu el ili povas rilati frazelementoj, kiujn oni povas nomi karakteriziloj.

Tiaj karakteriziloj estas.

5. **Ĝenitivo:** adjektivo, pronomo, numeralo karakterizanta substantivon (bela vetero; du homoj; nenia sciigo).

6. **Apozicio:** substantivo karakterizanta substantivon: reĝo Henriko; Napoleono, franca imperiestro...).

7. **Suplemento:** ĉia alia karakterizilo rilatanta al ia frazelemento escepte de la predikato. Suplementojn povas havi substantivo (la domo de la patro), adjektivo (plena de homoj), adverbo (malproksime de la domo), nepredikata verbo (morti por la patrujo). Laŭ la formo ili povas esti.

a) akuzativaj (longa tri metrojn),

b) prepozitivaj (amo al la patrino),

c) adverbaj (eksterordinare bela),

d) infinitivaj (kutimo fumi).

8. **Predikativoj:** vortoj karakterizantaj frazelementon helpe de predikato (aŭ kopulo). Ili povas karakterizi la subjekton (ŝi estas bela); tio estas la subjekta predikativo. Krome ekzistas adjekta predikativo, kiu karakterizas samtempe la subjekton kaj la agon (ŝi dancas nuda). Predikativo estas komuna nomo de vortoj predikataj, kiuj povas esti:

a) predikata substantivo (li iĝis prezidanto),

b) predikata adjektivo (la kampo estas verda). La predikata adjektivo alprenas formon adverban, se la frazo estas sensubjekta (estas varme).

c) predikata infinitivo (voli estas povi),

d) predikata prepozitivo (li estas de meza kresko).

(Atributo ŝajnas termino evitinda, ĉar en diversaj lingvoj oni ĝin komprenas jen epiteto, jen predikativo.)

Komplemento estas ĉia funkcio, escepte de la subjekto kaj predikato. La objekton oni povas nomi ankaŭ komplemento rekta, la adjektojn komplementoj cirkonstancaj. La ceteraj (epiteto, apozicio, suplemento, predikativo) estas komplementoj akcesoraj.

KALOCSAY.

Sirio, Azio. Laŭ UEA-1928 la unua pioniro estis Gabriel Haddad en 1909. Laŭ la Dietterle-statistiko en 1928 E-istoj troviĝis en 2 lokoj. Laŭ la ICK-raporto »precipe elstara estas ankaŭ en 1929 la laboro en S. sub la gvidado de Zeine-nour-udin en la Amerika Universitato en Beirut. Tri novaj kursoj okazis tie.« »La grupo de la Amerika Univ. de Beirut daŭrigas sian laboron.« (1932.) (Ŝajnas, ke sub liaj influoj, la samideanoj en Beirut perdis sian intereson. UEA-del. en 1933 en Damas.

Sivaĝi. Historia drameto. Originale de S i n h a, 1929, p. 68. »Ĝi estas iom stranga por nia okcidenta teatraĵa koncepto kaj rakontas lukton inter du hindaj maharaĝoj, kvazaŭ bona kaj malbona spiritoj.« (G. S., »E«, 1930, p:7.)

Sjögren (šögren) Carl Victor, svedo, asekura oficisto, urba konsilanto en Sundsvall. Nask. 12 jan. 1879 en Karlstad. E-isto de 1904. Del. de UEA de 1910 ĝis 1929. Kunfondinto de Amika Rondo en S., 1927. Prelagoj, artikoloj, kursoj. Organizis kursojn de eksterlandaj E-istoj.

Skanderbeg, heroo de Albanujo. Kompilis Cuk Simoni, 1929, 144 p. Historia verko pri la »savinto« de la albanoj kontraŭ la turka invado en 15-a jarcento. La unua E-lingva verko aperinta en Albanujo.

Skeel-Giörling Frederik, dano, lingvisto; tradukisto, interpretisto, instruisto. Nask. 11 feb. 1876 en Kopenhago (?), mortis 14 okt. 1910, akcidente dronis en la rivero Meuse en Belgujo. E-isto de 1893 (?). La unua vera E pioniro en Danujo. Fondis en 1906 »Societo de Danaj

E-istoj«, en 1908 kune kun Schröder kaj Bendix »Konversacia E-ista Klubo« en 1908. Centra Dana E-ista Ligo (ankaŭ kune kun Schröder). En 1907 la gazeto »Politiken« alvokis lin al Kopenhago por gvidi kursojn por 400 lernantoj. Kunred. de »Helpa Lingvo« de la apero ĝis 1907, kiam ĝi aperis sub nomo »Dana E-isto«, ĝia ĉefred., 1907—09. En apr. 1910 vojaĝis Parizon alvokita de Sébert, sendita de Centra Oficejo al Bruxelles por gvidi la E propagandon en la mond-ekspozicio tie, laboris en la »Bibliographie Internationale« kaj fariĝis red. de la buleteno de la kongresoj okazantaj dum la ekspozicio. Verkis E D Vortaron, 1904, lernolibron, 1906. Tradukis verkon de Couturat (Pour la langue int.), frazlibron de Carlsberg, fabelojn de Andersen ktp.

Skizo pri Filozofio de la Homa Digno. De P. Gilles, trad. E L a n t i. 1934, 148 p. »La aŭtoro, kun granda kaj foje ne tute filozofia fervoro, unue atakas kaj rejetas la fatalismon, kiun li tute erare identigas kun la Marksismo... Inter la polemikoj la aŭtoro iom neklare skizas la proprajn teoriojn pri la libera socio de estonteco, sen mono kaj sen ŝtato. La stilo estas malfacila.« (I. Farrand, »The B. E-ist« aŭg. 1934.)

Skizoj pri Teorio de Esperanto. Verkis E. Drez en, Libro dulingva (E kaj rusa). Ekrelo, 1931, 84 p. »La libro prezentas al ni skize ĉiujn lingvajn demandojn de E, ĝi traktas el ĝenerala vidpunkto gramatikon, fonetikon, morfologion, sintakson, semantikon, etimologion, parolas pri la evoluo kaj ŝanĝo de lingvoformoj, konsideras la diversajn vojojn de la lingvoprogreso. Ĝi enhavas multajn interesajn kaj aprobindajn opiniojn pri ĉi tiuj punktoj.« (Kopar, »L. M.« 1932, p:111.)

Sklenčka Otto, ĉeĥo, bankoficisto en Hradec Králové. Nask. 2 nov. 1891 en Zbraslav n. Vl. E-isto de 1908. Ĉef. del. de UEA por Ĉ. de post 1923. Estas lia merito, ke laŭproportio UEA-anoj en Ĉ superas ĉiujn landojn. Daŭre estis komitatano de ĈAE de 1930 ĝia kas. Sukcesega interna organizanto.

Sklenčkova Bozena, ĉefinno, edzino de O. S. Nask. 18 apr. 1897 en Ĉibuz. E-isto de 1919. Kunlaboris en Teritoria Oficejo de UEA (librotendado, administrado de membroj de UEA, ĈAE).

Skog (skug) Fredrik (ps.: Arbaro), svedo, komercisto. Nask. 6 febr. 1891 en Falun. E-isto de 1906. Sekr. de SEF, 1909—12, 1917—22 kaj Eldona Societo E, 1918-19, estrarano de diversaj E-kluboj. Gvidis kursojn (i. a. radio-kursojn 1926—28 el Falun).

Skolta movado. La skoltismo fondis lordo Robert Baden Powell, angla generalo, en 1908, ĉefe por disciplinigi la varmegajn, aventuremajn junulojn, donante al ili eblecon vivi laŭ knabaj instinktoj, tamen lernante memstarecon, progresante laŭ pedagogiaj principoj. La ĉefaj celoj estas: pli sana, pli sincera, pli memstara, ĉiam helpema, servopreta, purviva, modesta, ŝparema, indulga kaj bonhumora, tamen severa junularo, kiu konsideras ĉiujn — de ia ajn nacio, raso religio kaj profesio — kiel fratojn. Kiel int. movado ĝi jam atingis la nombron de pli ol du milionoj kaj al la ĉiukvarjare aranĝitaj tendaregoj, nomitaj jamboreoj, venas kelkdek-miloj el ĉiuj mondpartoj.

E radikiĝis en ĝi nur malrapide. En 1918 angla trupestro, A. W. Thomson (ps. Avoto) ekpensis sur franca militkampoj la ideon: por helpi la int. amikiĝon kaj reciprokan servon de la junularo oni fondu Skoltan E-istan Ligon (SEL). Li fariĝis prez., lia frato, subtrupestro K. Graham Thomson, la honora sekr. Poste Norman Booth, Netherton, brita trupestro, fariĝis la honora ĝen. sekr., kiu kun la kasisto D. H. Davis multege laboris por organizi SEL. La celoj de SEL estas: 1. disvastigi skoltajn idealojn per E, 2. disvastigi E-n inter la skoltaro, 3. krei skoltan E literaturon, 4. eldoni int. skoltan revuon, 5. solidarigi la senton de frateco, komunan en la skolta kaj E movadoj, inter diversnaciaj junuloj.

La Ligo aranĝis por atingi siajn celojn kaj pruvi la uzeblecon de E int. E tendarojn, 1922: Nederlando, 1923: Belgujo, 1924: Danujo, 1925: Hispanujo, 1926: Ĉeĥoslovakujo (tie

radioparolado pri la E skoltismo en Praha), 1927: Hispanujo, 1928: Belgujo, 1929: ĉe la jamboreo en Anglujo, 1930: Nederlando, 1931: Hungarujo (oficiale invitita de Hungara Skolta Asocio, kiu kune kun la Belga S. L. unue rekonis oficiale SEL; poste sekvis la Latva S. A kaj la Slovaka S. Centro Katolika.) En jamboreo 1929 (Birkenhead) ĉeestis preskaŭ cent skoltaj E-istaj el 18 landoj, eĉ hinda kaj japana. Samjare SEL starigis kapitalon (stato en 1934: 73 anglaj pundoj). De 1929 ageme kunlaboris kiel hungara reprezentanto P. Balkányi.

La jamboreo en 1933 (1—15 aŭg.) en Gödöllő, apud Budapeŝt, alportis seriozan progreson. Unuafoje E oficiale aperis en programo de jamboreo, en la poŝlibro, en la ĉiutaga skoltgazeto, sur kelkaj planoj estis menciita la E kunveno, (hungara trupo n-ro 199), donita de la estraro. La kunvenon de SEL ĉeestis 170 skoltaj, entute partoprenis la tendaron 200 skoltaj el 24 landoj, kiuj sciis E-n, do 1% de la ĉeestantaro, ĉe kelkaj nacioj (ĉeĥoslovaka, franca, norvega, japana, portugala, hispana, trinidad) la procento atingis aŭ superis 10%-ojn. E-istaj skoltaj deĵoris ĉe la biletvendejo, gazetvendejo, banko, poŝto, radio, skoltvendejo; aparta E svarmo de la fremdulgvidistaj skoltaj gvidis kelkfoje oficiale per E, 20 E-istaj skoltaj deĵoris ĉe la tendara skolta policistaro. Okazis preskaŭ ĉiutage dum radiosalutoj salutfrazioj en aŭ pri E, la 10-an de aŭg. kvinminuta E radioparolado de J. Bergreen, norvega repr. de SEL. Trifoje en la programo de la grandaj tendarfajroj, foje en la teatra programo estis E-kantoj kaj unu »subtendara fajro« antaŭ 3-4 mil personoj estis tute por E. Ĉe la poŝtoŝtampoj oni ricevis senpage E-lingvan »Memorfolion« donacitan de UEA kaj L. M. Ĉe kelkaj tendoj, ĉe la jamborea banko, kaj ĉe hotelo pendis E flag-(et)oj. Unu el la aŭstrijaj skoltasocioj prezentis al la monda skoltestraro rekomendon pri uzo de E, sed oni ne diskutis pri ĝi. Al Baden Powell estis transdonitaj salutoj kaj donaco (de-

segnaĵoj fare de E-skoltoj. Skolt-orkestro ludis la E-himnon dum suprenigo de la SEL-flago. En la jamborea sonfilmo estas sceneto pri E.

La 22-an tendaron de SEL invitis la Slovaka Katolika Skolta Centro al Banská Bystrica en Slovakujo, kie ĝi okazis kune kun slovaka tendaro 16-31 jul. 1934. Partoprenis 9 nacioj. La tendaro havis poŝtstampilon kun slovaka kaj E-a tekstoj. Partoprenis 85 skoltoj, inter ili 25 E-istoj. 29 jul. okazis sur la ĉefplaco de la urbo publika oficiala festsaluto je honoro de la E-ista skoltaro, disaŭdigita per megafonoj.

SEL eldonis en 1920 »Bultenon de SEL« (aperis 5 trimonataj n-roj), poste la oficialaj sciigoj aperis en »E-ista Junularo«, gazeto de TEAJ, kaj de 1926 en »Skolta Heroldo«, por kies aperigo penadis multe G. Ramboux. Post ĉeso de ĉi tiu belaspekta revueto de sept. 1931 SEL eldonas kvaronjaran »Skolta Bulteno«-n. Multobligitajn bultenojn eldonis la Londona E Skolta Klubo kaj la Budapeŝta SEL-tendaro kaj la E-istaj aranĝantoj ĉe la jamboreo 1933. Propagandilojn eldonis la Ligo angla, france, hispane, kaj germane de 1920 preskaŭ ĉiujare. Artikoloj kaj E-rubrikoj aperas en multaj gazetoj. Glumarkoj: SEL-tendaro 1931, Budapeŝt, Jamboreo, 1933 kaj SEL-tendaro, 1934 en B. B. La Hungara Skolta Asocio eldonis fakvortareton en kvin lingvoj, inter ili en E. En radio oni parolis pri SEL krom Praha kaj Budapeŝt, ankaŭ en Kraków, Lisboa, Lyon, Lille, Brno, Breslau, Bratislava, Stuttgart, Nürnberg. En la budapeŝta skolta parko staras marmora memorstoneto pri la SEL-tendaro, 1931.

La Belga Skolta Ligo oficialigis E-ŝtofinsignon, la Hungara Skolta Asocio eldonis inter la rubandetoj, montrantaj la lingvoscion, ankaŭ tiun kun vortoj: »Esperanton parolas«. Ambaŭ asocioj havas E-sekcion. La Int. Skolt-oficejo rekonis E-n inter la lingvoj por interpretista ekzameno, kvankam la Int. Komisiono en 1934 decidis ne rekomendi E-n al skoltoj.

Estraro de SEL: prez. Avoto; sekr. N. Booth, Netherton, Huddersfield. Anglujo; kas. D. H. Davis, 23 East

Dulwich Grave, East Dulwich, London S. E. 22. Reprezentantoj (agentoj) en 23 landoj, memstaraj distriktoj en Hungarujo, Norvegujo, Polujo kaj Slovakujo. Membrostato: 700. Aparta skoltina sekcio. BALKÁNYI.

Noto de M. C. Butler. En Anglujo skoltoj kaj skoltinoj ambaŭ rajtas gajni la interpretistan insignon per scio de E. Baden Powell mem rekomendis al skoltoj en sia libro »Scouting for Boys«, ke ili lernu E-n, tamen en oficialaj rondoj oni ne montras multe da intereso pri E.

Skotlando, v. Britujo.

Skr.ba kongreso. Estis la lasta provo de Z por unuigi ĉiujn personojn, kiuj sin nomis amikoj de la lingvo int. En majo 1897 li dissendis invitilojn al gazetoj kaj reprezentantoj de diversaj mondlingvo-sistemoj. Sed la kongreso ne povis efektiviĝi. Post tiu ĉi malsukceso Z skribis: »Ĉiuj penoj kaj provoj kontentigi niajn kontraŭparolantojn estas vanaj. Ni forlasu por ĉiam ĉiujn provojn de cedado kaj iradu de nun trankvile vojon ĉiam rektan antaŭen, memorante, ke la vero restas sur nia flanko kaj ke kiu, volas kontentigi ĉiujn, kontentigos nenium.« I. SIRJAEV.

Slavík Frantisek, ĉeĥoslovako, fabrika oficisto en Praha. Nask. 11 aŭg. 1900 en Bystrá. Tre aktiva administra funkciulo de ČAE de post 1928.

Stetterød Aagot (nask. Johansen), norvegino, oficistino en Oslo. Nask. 17 jul. 1883. E-isto de 1912. Fondinto de la restarigita Klubo E-ista en Oslo 28 nov. 1916, prez., vicprez., ktp. Sekr. de NEL kelkajn jarojn. Gvidis kursojn.

Stetterød Ole Brochmann, norvego, ingeniero en Oslo. Nask. 23 marto 1877. E-iĝis 30 majo 1907. Ano de la unua E klubo en Oslo. Vicdel. de UEA 1910—18, vicprez. ĉe la unua skandinava E kongreso en Göteborg, 1918. Faris la unuan E kurson inter blinduloj en Oslo, 1910.

Slovakujo, v. Ĉeĥoslovakujo.

Smarius, F. C. D., nederlandano, fabrikanto. Nask. 5 okt. 1887 en Tilburg. E-isto de 1911. Daŭra laborado por E. Vizitis plurajn UK-jn.

Smetak Francisko, ĉeĥo, ing., prof. ĉe komerca akademio en Hradec

Králóvé. Nask. 23 sept. 1898 en Holice. E-isto de 1913. Instruas oficiale E-n kiel nedevigan fakon en sia lernejo de 1923 seninterrompe.

Smítal Walter, aŭstro-germano, biblioteka oficisto. Lernis E-n dum la militkaptiteco en Siberio. Estis prez. de E-Delegitaro de Wien kaj ĝen. sekr. de AED kaj de IEMW. Kunlaboris en la aŭstraj kongresoj en Salzburg, Graz, kaj Wien (1927). Aranĝis E-ekspozicion en punksalonego de Nacia Biblioteko okaze de solena malfermo de IEMW. En 1925 li gvidis la duan E-kurson en Radio-Wien kaj poste dum pluaj 7 jaroj estis preleganto tie. Gvidis kursojn ankaŭ en instruista seminario, ktp. Bonega tradukanto de paroladoj. Helpis fondi »Aŭstria E-iston«; multaj artikoloj kaj recenzoj.

Smith Albert Edward, anglo, sekr. de akcia kompanio. Nask. 21 jan. 1864 en Kettering. E-isto laŭ Z A de 1903. De 1911 sekr. de la grupo en K. De 1907 del. de UEA. Sekr. de Mezlanda Fed. ĝis 1918, kaj poste prez. de Sudmezlanda Fed.

Smulders J. N. J., nederlandano, kuracisto. Pioniro de katolika E-movado. Red. de la »N. Katoliko« kaj de »Katolika Espero«. Aŭtoro de diversaj broŝuroj, ankaŭ pri organizo.

Sneĵko Dimitrij, sovetiano, blankruso, kuracisto. Nask. 24 sept. 1903 en Orša. E-isto de 1918. Membro de CK SEU, aktiva E-funkciulo en Blankrusujo, multe laboris por organizo de kolektiva E-korespondado. E-radio-disaŭdigoj el Minsk k. a. Verkoj: skizoj pri historio de laborista E-movado, anatomia vortaro, lernolibro de E por blankrusoj, vortaroj E-B kaj B-E (ankoraŭ ne eldonitaj). Lastatempe li multe laboris por organizo de medicinista sekcio de SEU.

Socia'demokratik. v. ISE, Laborista movado, Marksismo.

Socialismo: ĝia ideologio kaj realigo. De S. Chazan. 1933, 48 p. »Kontraŭ la revolucia socialismo, li estas adepto de la evoluismo, emfazante, ke la socialismo estas ne nur ekonomia, sed ankaŭ morala problemo, por ĝia efektivego oni bezonas ĝeneraligon de l' altruista moralo.« (xy, »Lingvo-Libro«, 1934, p.: 26.)

Societo de Amikoj (Kvakeroj.) »La Religia Societo de Amikoj« troviĝas plejparte en Ameriko kaj Britujo. Kiel Kristanoj ĝiaj anoj rifuzas partopreni an ajn militadon. Ili ne juras, ĉar Kristo tion malpermesas. Ili ne partoprenas eksterajn sakramentojn, kredante, ke Kristo ordonis nenion tian. Ĉe siaj religiaj kunvenoj troviĝas neniu pastro, neniu preĝlibro aŭ ceremonio: ĉiu ĉeestanto, viro, aŭ virino, kunvenas en plena egaleco, kaj la sola kunvenestro estas Jesuo Kristo. La elstara diferenco inter la Amikoj kaj aliaj Kristanoj estas (a) ili pli forte akcentas la individuajn respondecon; (b) la kredo, ke Dio senpere parolas al ĉiu homo; (c) la celo reveni al pura Kristanismo de la primitiva eklezio, sen postaj aldonaĵoj. Diversaj libretoj pri la Societo aperis en E: precipe »La Fundamentoj de la Kvakerismo« (Stephens, trad. Butler). Ekzistas Kvakera E-ista Societo. Sekr. J. T. Harrod, 66 Kington Road, Olton, Birmingham.

M. C. BUTLER.

Societo Sankta Miĥaele. v. Katolika Movado.

Söderberg (söderberj) Karl Ludvig, svedo, fil. magistro, instruisto de angla lingvo. Nask. 6 jan. 1903 en Smedjebacken. E-isto de 1929. Farigis E-isto post prelego de H. Sepik. Vicsekr. de Univ. E Pacifista Ligo. Estis estrarano de ES de Upsala, ktp. Artikoloj. Direkciano de SEI de 1934. Prelegisto en E ĉe sveda radio de 1934.

Sohrmann (zorman) Arthur, germano, popollerneja instruisto. Nask. 31 jul. 1871 en Unkersdorf apud Dresden. E-istiĝis post la Dresdena UK 1908. Sukcese prop. en instruistaj rondoj. Jam en 1910 li gvidis en sia vilaĝo Weinböhla kursojn por infanoj. Prez. de G. Asocio de E Instruistoj, 1919—24.

Sokrato, kvarakta tragedio de Ch. Richet, et la franca trad. en ritma prozo J. Couteaux, 1914, 101 p. Oni volis prezenti ĝin dum la X-a UK, sur la p.: 5. ni eĉ legas: »Estas ludita dum la Deko UK de E (Paris, aŭgusto 1914) de la jenaj geaktorj:«

Soler Valls (soler valjs) Fernando, hispano, ĉeftelegrafisto. Nask. 15

marto 1873 en Albaida (Valencio). Gvidis multajn kursojn. Verkis gramatikojn (ankaŭ por infanoj). Prop. artikoloj. Kunlaboris al »La Suno Hispanac«.

Solis F. X., kanadano, katolika pastro en seminario, en Montreal. Nask. en 1832, mortis 29 majo 1903. Aliĝis al E en 1895 kaj faris pioniran laboron, liaj varbitoj fondis grupon, gazetojn, kies laborojn li aktive partoprenis.

Solomon Gladys Gladstone, angliano. Aŭtoro de facilaj legolibroj: »E por Infanoj« kaj de alilingvaj lerniloj.

Solovjev (solovjov) Miĥail, ruso, juĝisto (de 1900 en Rusujo, de 1926 en Jugoslavujo en Novi Sad). Nask. 26 okt. 1874 en Odessa. Estis prez. de Amatora Fotografa Societo en O. instruis jurajn sciencojn en gimnazioj ktp. E-isto de 1889, sub n-ro 411 laŭ ZA. Prez. de ES en Kiŝinev de 1913. Prez. de ES en Odessa. UEA-del. en K. kaj O., poste en Petrovaradin, Jug. Verkis lernolibron kun du vortaroj. En »La E-isto« de Trompeter li aperigis anekdotojn, versajojn, tradukaĵojn, ekz. en 1892 »Tri Palmoj« de Lermontov; tiu ĉi versajo kaj la »Plendo« estis elektitaj de Z por la Fund. Krestomatio. Poste aperis de li versajoj originalaj kaj tradukaĵoj de Heine, Majkov, Lermontov, V. Iliĉ, Puŝkin en »La Revuo«, LM, »Bizantio«, HDE, »La Suda Stelo« kaj »Konkordo«.

Solzbacher (solzbaĥer) Wilhelm, germano, d-ro de politikaj kaj ekonomiaj sciencoj, verkisto, ĉefsekr. de MOKA, vivas en Luksemburgo. Nask. 1 febr. 1907 en Honnef a. Rh. Estrarano aŭ komitatano de IKA, Internacio de Militkontraŭuloj, kaj aliaj societoj. Tradukisto kaj estro de la tradukservo en multaj int. kongresoj. Paroladoj en 9 lingvoj en 20 eŭropaj landoj kaj en Ameriko. Verkoj diverslingvaj, i. a. pri Rathenau, 1933. E-isto de 1921, varbita de MOKA. E-kursoj en Honnef, Bonn (regule pagita de la urbo), Köln. Depost 1923 estrarano de MOKA, nun ĝia ĉefsekr. kaj red. de »La Juna Batalanto«. Kunlaboris al »Katolika Mondo«. Publikigis centojn da artikoloj kaj raportoj pri E kaj faris multegajn varbparol-

adojn. Kunlab. de la Enciklopedio.

Someraj Universitatoj okazadas dum ĉiu UK ekde 1925. Liaj programoj estas pure »humanismaj« (filozofio, pedagogio, folkloro, ktp.). Dum la UK 1924, en plenkunsido estis decidite, ke estonte, por pliriĝigi la programon de la UK-oj, estu organizotaj t. n. S. U.-oj. La venontan jaron, jam en Genevo en 1926 la antaŭtago de la UK okazis solena malfermo de la S. U. en la ĉefsalono de la Geneva Universitato. La unuan kaj samtempe malferman lecion havis fino Won Kenn: pri Konfucio. Rektoro de la unua S. U. estis prof. Cart. Post la Edinburga UK 1926 okazis aldona decido: ke prelegantoj povas esti nur profesiaj profesoroj (aŭ almenaŭ homoj kun univ. diplomoj). La prelegoj okazadas regule ĉiujare en la sama urbo de la UK. Viziti ilin rajtas ĉiu kongresano senpage. La kongreskarto servas kiel enirbileto.

E. WIESENFELD.

Sonfilmo. Ĉefa motivo por utiligo de E: filmo en nacia lingvo estas limigita je la koncerna lingvoteritorio. Ankaŭ kelkaj gravaj film-fakuloj, ekz. Laemmle kaj Chaplin rekonis la valoron de E tiurilate. Tamen okazis ĝis nun nur kelkaj provoj. En 1929 okaze de la E-kongreso Nordamerika (9-14 jul.) la Paramount Filmkompanio farigis parolfilmon; ĝi konsistis el triminuta dialogo kaj saluto al la mondo de E (H. Hetzel kaj s-ino C. Chomette). Dum la 22-a UK en Oxford en 1930 la Paramount Kompanio prezentis E-an parolfilmon. En 1933 okaze de la skolta mondtendaro en Gödöllő por la granda jamborea sonfilmo oni faris sceneton, sur kiu diverslingvaj skoltoj parolas frazon en propra lingvo, poste unu (P. Balkányi) diras, ke ili ĉiuj komprenas unu la alian en E kaj ili vivukriante faldas la verdstelan flagon de SEL. Dum la UK en Stockholmo 1934 oni prezentis la sonfilmon »Morgaŭ ni komencos la vivon.« La filmon oni fabrikis originale en germana lingvo kaj poste oni aldonis E-lingvan parolon, sub la gvidado de Jean Forge. La prezentado havis gravan sukceson.

Songo de Somermeza Nokto. Dramo

de Shakespeare, el la angla trad. Briggs. 1921, 70 p.

Sonorilo kaj Kanono. »Poemaro en prozo.« Verkis E. Isaac, el la rumana trad. T. Morariu, 1930, 60 p. »La mallongaj tekstoj temas ofte pri milito kaj paco. Simpla, sed perfekta verketo, ame kaj zorge prilaborita de l' tradukinto.« (G. S. ,E', 1931, p: 25.)

Soriano Trinidad, hispano, provincedeputado en Sevilla. Lasta prez. de HSPE. Fond. de la EG en Sevilla.

Sós (ŝoŝ) Edmund, hungaro, d-ro, kuracisto de 1891 en Wien. Nask. 25 dec. 1863 en Sátoraljaujhely (Hung.), mortis 27 jul. 1931 en Wien. Ĉ. 1900 li aliĝis el E, al kiu li dediĉis sin tute ĝis la morto. Estis vicprez., poste hon. prez. de Unua E-Unuiĝo, Wien, estrarano de iama AEL, »Nova Tempo«, AED kaj fine vicprez. de AEA. Multajn jarojn ĉefdel. kaj komitatano de UEA. Ano de la loka Kuratora Komitato de IEMW. Pasia amo de la Paneŭropa ideo kaj gvidanto de tiu movado sur E-kampo. Kunlaboris al »German-Aŭstria E-isto«, »Nova Tempo«, »Aŭstria E-isto«, »Medicina Revuo«, HDE kaj ,E'. Verkis (kun Glück) E-lernolibron, 1910, kiu aperis en 7 eldonoj. Trad. »Solandro« de Bonsels, 1924; »Paneŭropa-Manifesto« de Coudenhove-Calergi.

Soubranne (subran) Fr., franco, prof. en Tulle. De 1908 seninterrompe UEA-del.

Southcombe (saŭth'km) Herbert William, anglo. Nask. 21 marto 1859 ĉe Stoke-under-Ham, Somerset. E-isto 9622. Ĉeestis la UK en Boulogne. Verkis: »Tutmondaj Fajro-kutimoj«, 1905. Kontribuis al »The E-ist«, 1903-4 kaj aliaj gazetoj.

Spatharis Johano, greko, d-ro de teologio, arĥeologio kaj filologio, eksprofesoro de la Odesa Universitato, nun sekr. de la Salonika Universitato. Nask. 1868 en Ankara. Laboris multe por E, gvidas la movadon en Saloniki.

Spesmilo. (Sm.) Unuo en la int. helpa konsistemo decimala, proponita en 1907 de R. de Saussure kaj uzita antaŭmilite de E-istoj, ĉefe de la Ĉekbanko E-ista. 1 Spesmilo = 10 Spescentoj = 100 Spesdekoj =

1000 Spesoj. 1 Spesmilo estis egala al duondolaro, unu rublo, 2.50 svisaj frankoj ktp.

Spieler (ŝpíler) László (ps. L. Repeips), hungaro, pentrajagente. Nask. 7 marto 1906 en Vajszló. E-isto de 1925. Kelkajn jarojn estrarano de HESL-grupo. Tradukanto de hungaraj noveloj por diversaj E-gazetoj. Aparte eliris 4-a n-ro de »E-lingva Novelbiblioteko« kaj »For la Vian-don« de V. Rákosi.

Spielmann (ŝpilman) Siegfried Eduard, sviso, d-ro de politikaj kaj ekonomiaj sciencoj, revizoro de int. poŝtmandatoj en pens. Nask. 20 jun. 1870 en Obergösgen. Havas instrudiplomon pri la lingvoj franca, itala kaj angla. Kiel demokrato, li ĉiam partoprenis la land- kaj urbopolitikajn agadojn. E-isto de 1910. De 1913 konstanta prop. kaj gvidado de kursoj, ankaŭ de superaj. Deko da publikaj paroladoj por E en Bern kaj en aliaj svisaj urboj. Estis prez. de ES en Bern, ktp. Ĝisprez. kaj hon. prez. de ILEPTO, kiu sub lia prezido kaj kunlaborado de la fratoj Filliatre kreskis multe. Li varbis kiel kolektivan membron la Internacion de PTT; ktp. Poŝtestro de la UK en Bern, 1913; krome li partoprenis 8 UK-jn. Verkis gvidlibreton kaj gvidfoliaron pri Svisujo; ambaŭ ilustritaj kaj oficiale, 1923 kaj 1925. Redaktas depost 1928 ĉiusemajnan E-Angulon en svisa PTT- kaj doganfaka personara gazeto. Oftaj prop. artikoloj.

Spiridoviĉ Ēfim Feofanoviĉ, blankruso, sovetiano, multajn jarojn ĵurnalistoj (de 1918) kaj instr.-lektoro pri politika ekonomio kaj ekonomia geografio, de 1931 scienca laboranto de Moskva kaj Ĥarkova scienc-esploraj institutoj de lingvoscienco. Nask. en 1891 kiel filo de gelaboristoj. Esploristo pri teorio de int. helpa lingvo laŭ marksisma vidpunkto. Aŭtoro de R-E Vortaro, 1926 kaj 1928; grava studo rusingva »Lingvoscienco kaj lingvo int.,« 1931, aperinta ankaŭ en japana traduko, kaj multaj artikoloj samtempe en SEU-gazeto, SR, La Nova Etapo. LK de 1929.

Spirita ĵuvelaro. Katolika preĝlibro. 1912, 292 p.

Sp!te la vivon! Mezgajaj poemoj

originalaj kaj parodiaj de Mi ŝu Beraru. 1928, 110 p. »Jen nova jonglisto de vortoj kaj rimoj, ĉu en originalaj poezioj, ĉu en la parodioj. Lerta, sprita artfajraĵo.« (G. S. 'E', 1928, p: 205.)

Sporta Esperantista Ligo. Fondiĝis en 1922. Prez. estis Yrjö Ojander, Helsinki. En UEA-jarlibro aperis informoj ĝis 1927, poste ŝajne tute ĉesis. — (P. B.)

Sporto. La enpenetro de E en la sportan afergvidon kaj aranĝadon de sportaj okazintaĵoj daŭris tre longe. Tio estas komprenebla, se ni konsideras, ke la homoj okupiĝintaj pri E kaj pri sporto estis komence tute alispecaj, kaj ankaŭ la klopodoj de kelkaj fervoruloj, vivtenaj apartan E-istan sportan asocion aŭ ligon, restis sen daŭra sukcesoj. Kvankam la ofte naciismaj aŭ eĉ ŝovinismaj burĝulaj sportasocioj ne uzas E-n, eĉ kelkfoje kontraŭbatalas ĝian enpenetron, la laboristaj sportistoj (kiuj precipe de post la milito tre multnombriĝis) rekonas ĝiajn avantaĝojn kaj utiligas ilin. La unua eblo je uzado de E estas la preparaj skribaj laboroj de grandaj int. sportfestoj. Ĉirilate E jam plurfoje pruvis sian taŭgecon; ekz. dum la int. laborgimnastika kunveno en Nürnberg (1929), la dua laborista olimpiado en Wien (1931) kaj la laborista sportfesto en Aussig (Ĉeĥoslovakujo, 1933). Dum tiuj ĉi festoj estas aranĝitaj ankaŭ interfratiĝkunvenoj de la E-istoj, kiujn ĉiam tre multaj E-istoj partoprenis. Deĵoris dum la festoj ankaŭ multaj E-istoj kiel informantoj, gvidantoj, ktp. Oni jam uzis E-n ankaŭ por sportteknikaj celoj: unua provo dum la Spartakiado en Moskvo (1931). Tamen prezentas grandan malhelpon ĉirilate la manko de internaciskale aprobata sportteknika vortaro. Nun jam la Vienaj Naturamikaj E-istoj okupiĝas pri tio. E bone prosperas ankaŭ en la turisma branĉo de sporto. Inter la naturamikoj ekzistas preskaŭ en ĉiuj urboj grupoj E-istaj kaj multaj el ili uzas E-n kiel helplingvon dum siaj eksterlandaj ekskursoj, aliflanke eĉ organizo de vizito de eksterlandanoj en siaj hejmoj. Ni povas konstati tre

bonan kontakton ankaŭ inter la Naturistoj (anoj de natura vivmaniero: vegetaranoj, nudistoj, ktp.) kaj E-istoj en Francujo, Germanujo, Italujo, Finnlando, Aŭstrujo, ktp.

K. NEBENZAHL.

Sprotte (ŝprotte) Rudolf, germano, mortis. Aŭtoro de AORO, stenografio germana, rusa, hispana, (1908), sistemo propagandita antaŭmilita. Kunverkis int. por uzo en la E, angla, franca, E-lernolibron, 1910.

SSM: Societo Sankta Miĥaelo, v. Katolika Movado.

Stahlberg Hermann, estono, orajisto. Nask. 20 sept. 1865 en Tartu, mortis 21 marto 1932 en Rakvere. E-isto ekde 1892, longjara korespondanto kun Z. Aŭtoro de 2 lernolibroj kaj de vortaro E — Estona. Tradukis diversajn artikoletojn kaj partojn de la eposo »Kalevipoeg.«

Stamatiadis Anakreon, d-ro, greko, kuracisto-patologo. Nask. 1. sept. 1868 en Firenze (Italujo). Unue ĉefkuracisto, poste dir. de la sanecaj oficejoj sur la insulo Samos. Ekzilita en 1913 pro politikaj intrigoj en Istanbul, li okupis tie gravajn postenojn. Nuntempe li vivas en Athen. Al E li aliĝis en 1904 kaj plenumis pioniran laboron en Turkujo kaj Grekujo. En 1906 li fondis societeton en Samos, li atingis gravajn sukcesojn en la oficialaj rondoj, publikigis grekan E-gazeton dum 1909—12 kaj 1925—26. En Istanbul li fondis societeton kaj Gazeton »Bizantio« (jul. 1921 — jul. 1924). En Athen li fondis E-societojn, en 1929 gazeton L. I. Li verkis kaj eldonis 15 librojn pri kaj en E, la plej konataj estas liaj grekaj E-lernolibroj, vortaro 450 paĝa kaj la »Nova Gramatika Libro por la Supera Kurso.« La eldonnombroj estis 1—2.000 e-roj. Gvidanto de la oficialaj kursoj en Athen. L. K. kaj ano de la Akademio.

Stanciff (stanklif) Fenton, usonano, instr. pri klasika pianoludo. Nask. 12 jul. 1895 en Meadville, Penns. Daŭra prop. laboro. Laŭ lia instigo Heywood Broun, fama »kolonskribisto« por ĉeno da 25 gravaj ĵurnaloj diverse-loke de New York ĝis San Francisco, verkis artikolon pri E; disvastigo pli ol 1,500.000 e-roj, 2 okt. 1931. Multe

studis la vortoftecon en E, artikolo en „E” nov. 1932, kalkulis la tutan tekston de »Hura«, pretigis ankaŭ aliajn statistikojn pri vortofteco. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Standardo Esperant's 2. Estas akceptita de la 1-a UK en Boulogne sur Mer en 1905: verda tuko, kiu havas en la supra maldekstra angulo kvadraton kun verda stelo, kaj en la stelo estas litero E. La aŭtoroj de la S. estis Michaux, Sergeant kaj Duchochois, gvidantoj de la EG en Boulogne. Kelkan tempon antaŭ la kongreso ili vizitis la komerciston Gras (Faidherbe strato 14). D. petis kretan kaj sur la vendotablon desegnis kvarangulon. Poste oni sin demandis, kio estas farota. D. volis verdan standardon kun trikolora strio, S. sugestis ke estus pli bone ne naciigi la standardon kaj M. insistis, ke ĝi havu stelon. S. rememorigis, ke prefekta dekreto en la departemento postulas, ke societaj standardoj portu distingan signon, do laŭ li estas necese skribi literon E meze de la stelo. La S. estis tuj mendita ĉe la firmo, ĝi estis longa je unu metro kaj duono, larĝa je unu metro, la blanka kvadrato estis kvindek centimetra. Kelkajn tagojn poste, dum la unuaj tagoj de aŭg. jam flirtis la S. en la urbaj stratoj, sur multaj domoj, ĉe la fasado de la teatro, kaj de la Granda Kafejo, la kongresa akceptejo. La 9 aŭg. estis sur la tagordo de la kongreso ankaŭ la S. Ostrowski estis la oratoro, kiu prenis ĉe la balustrado de la teatro unu el la standardoj kaj diris: »Ni ne serĉu; la standardo, kiu nin kondukos al la venko, kiu nin gvidos estonte kaj flirtos en ĉiuj landoj de la mondo, jam ĝi estas.« La kongreso unuvoĉe akceptis tiun proponon. Z subskribis du el la unuaj standardoj; unu estis donacita al Michaux, la alia al Sergeant, kiu konservis la standardon dum 23 jaroj, poste donacis ĝin al la E-Muzeo en Wien. Laŭ »Norda Gazeto« 15. aŭg. 1931.

Staniĉić Paja, d-ro, advokato en Zemun (Jugosl.). Socia publika aganto, eldonis nacilingvajn librojn pri la nova monteorio de S. Gesell. Verkis en 1913 E-broŝuron pri la temo

kaj en 1926 aperis de li traduko de »Oro kaj Paco« de Gesell.

Starr Mark, brito, ekskarbministro, instruisto en lab. edukado. Nask. 27 apr. 1894 en Shoscombe, nun loĝas en Usono. Verkis kelkajn librojn pri ekonomio kaj socia historio. Prizorgis en Britio skriban E-kurson, E-fakon en »Daily Herald«, instruis kursojn. Kunlaboris al SAT-gazetoj.

Statistiko. Havigi findindajn ciferojn pri la disvastigo de E en la tuta mondo: jen estis unu el la taskoj de la E-ista Centra Oficejo. La subaj detaloj estas prenitaj el la kajero »Internacia Muzeo«, 1910, eldonita ankaŭ de ECO, kaj ili montras la nombron de la grupoj kaj gazetoj de 1888 ĝis 1909.

	Grupoj	Gazetoj
1888	1	—
1889	3	2
1890	3	3
1891	7	2
1892	13	1
1893	15	1
1894	19	1
1895	18	2
1896	24	2
1897	30	2
1898	37	3
1899	32	3
1900	26	3
1901	26	3
1902	44	12
1903	113	21
1904	186	26
1905	308	36
1906	474	45
1907	721	61
1908	1266	99
1909	1447	106

Numero de la libroj:

1889	29
1894	88
1899	123
1904	211
1909	1330

Post la milito la plej grava eksperimento pri E-ista statistiko estis tiu de d-ro Dietterle, dir. de la Germana E-Instituto. La ciferoj montras la staton en 1926 kaj la detalaj tabeloj kun klarigoj aperis sur paĝoj 133—156 de „E” 1928. (Ties kelkaj adiciaj eraroj estas korektitaj en niaj finsumoj.)

En la suba ciferaro la unua kolono montras, en kiom da lokoj ekzistas E-istoj, la dua kolono montras, kiom da grupoj ekzistas entute kaj la tria kolono montras la tutan nombron de la E-istoj.

Eŭropo:	Lokoj	Grupoj	E-isto
Albanujo	2	—	6
Aŭstrujo	483	96	7696
Belgujo	98	26	3359
Britujo	490	144	7855
Bulgarujo	121	35	1744
Cehoslov.	1114	116	8957
Danujo	69	17	990
Estonujo	82	16	784
Finnlando	172	15	825
Franco	500	101	5237
Gibraltaro	1	—	4
Germanujo	1087	441	30868
Grekujo	6	3	1968
Hispanujo	173	47	3591
Hungarujo	122	47	3052
Irlando	33	1	343
Islando	12	—	24
Italujo	199	43	5341
San Marino	1	—	1
Latvujo	110	30	1994
Jugoslavujo	52	10	1498
Liĥtenŝtejno	1	—	1
Litovujo	76	18	780
Luksemburgo	2	—	2
Malto	4	—	7
Monako	1	—	1
Nederlando	177	51	6649
Norvegujo	122	5	380
Polujo	199	51	4690
Portugalujo	16	2	79
Rumanujo	96	15	1912
Svedujo	155	28	1436
Svisujo	135	39	1821
Turkujo	7	—	49
USSR	425	95	1479

Azio:

Brita Hindujo	12	—	17
Br. N. Borneo	1	—	1
Cejlono	1	—	1
Cipro	1	—	1
Ĉinujo	29	7	476
Filipina ins.	2	—	4
Hindo-Ĉinio	1	—	1
Japanujo	112	181	6903
Koreo	2	—	2
Makao	1	—	1
Malajo-ŝtatoj	1	—	1
Mongolujo	1	—	10

Ned. Hindujo	22	—	87
Palestino	6	2	252
Rodos-insulo	1	—	1
Persujo	8	1	69
Setlementoj	1	—	1
Siamo	1	—	1
Sirio	2	—	3

Afriko:

Abisenujo	1	—	1
Acoroj ins.	4	—	6
Alĝerio	5	—	26
Angolo	6	—	10
Egiptujo	6	1	104
Ebur-bordo	1	—	1
Fernando-Po	1	—	1
Gvineo hisp.	1	—	1
Kanariaj ins.	3	2	25
Kaplando	4	—	5
Kapverdaj ins.	1	—	1
Kongo belga	5	—	5
Kongo port.	1	—	1
Liberio	1	—	1
Libio	1	—	1
Madagaskaro	1	—	1
Maroko	10	1	40
Maŭricio	1	—	1
Natalo	1	—	4
Nigerio	1	—	1
Ora Bordo	1	—	1
Oranjo-ŝtato	1	—	1
Orient-Afriko port.	2	1	6
Rodezio	3	—	4
Som.-bordo it.	1	—	1
St. Heleno	1	—	4
St. Tomaso	1	—	1
Sudano fr.	1	—	1
Transvalo	7	1	47
Tunizio	4	—	4

Ameriko:

Argentino	37	3	445
Barbadoso	1	—	1
Bermudo-ins.	1	—	1
Bolivio	3	—	5
Brazilo	47	17	1182
Ĉilo	3	—	3
Dominika r.	1	—	5
Ekvadoro	1	—	1
Gujano ned.	1	—	6
Gvatemalo	1	—	1
Honduraso	1	—	1
Jamaiko	2	—	2
Kanado	28	4	52
Kolombio	7	—	11
Kosta Riko	2	—	14
Kubo	43	—	207

Kurasao	1	—	1
Meksiko	1	—	1
Nikaragvo	11	2	88
Novlando	1	—	3
Panamo	1	—	1
Paragvajo	1	—	12
Peruo	1	—	3
Porto-Riko	4	—	5
Salvadoro	1	—	1
St. Vincent-ins.	2	—	4
Trinidad-ins.	1	—	6
Urugvajo	9	3	416
Usono	215	47	4845
Venezuelo	3	—	8

Aŭstralio:

Aŭstr. Feder.	69	10	1087
Nov-Zelando	72	10	325
Fiĝi-ins.	2	—	2
Havajaj ins.	1	—	1
Nova Gvineo	1	—	2

Eŭropo	6548	1502	109690
Azio	205	191	7832
Afriko	77	6	306
Ameriko	431	76	7331
Aŭstralio	145	11	1417
Entute	7201	1786	126576

Dietterle faris la sekvan resumon pri la rezultoj: »En pli ol 100 landoj, en pli ol 7000 lokoj de la mondo, ekzistas entute 126.576 E-istoj, pri kiuj ni havas fidindan scion. El ili 41.751 estas organizitaj en 1776 grupoj (inter ili 632 fakaj grupoj), el kiuj 693 posedas E-bibliotekon. — La grupoj okazigis dum 1926 2531 kursojn, kaj entute laŭ raportoj 12,014 kursojn. Krom tio ekzistas 16.987 izole vivantaj E-istoj en lokoj, kie ne estas aŭ ne respondis grupo, kaj 67.838 ekstergrupaj E-istoj en lokoj, kie estas grupoj. La ciferoj estas ĉiukaze multe tro malaltaj. Sed takado pri la fakta situacio ne estas devo de statistikestro.»

Oni povas juĝi pri la kompleteco de tiu ĉi statistiko, se oni komparas la ciferojn de la Dietterle-statistiko kun diversaj aliaj ciferoj. La samjara statistiko, efektivigita de CK SEU, montris, ke en 1927 en Sovetio troviĝis 16.066 organizitaj E-istoj, formantaj 527 rondetojn kaj ĉelojn. La »Adreslibro de Pollandaj E-istoj« 1931 enhavas adresojn de 3996 pollandaj

E-istoj, kiuj loĝas en 551 lokoj, krome adresojn de 64 polaj E-istoj, loĝantaj eksterlande. Laŭ la takso de la redakcio de la Adreslibro en Pollando ekzistas ĉ. 3000 organizitaj E-istoj, aliaj ĉ. 3000 neorganizitaj. Findeco de la Dietterle-statistiko en la diversaj landoj dependis ĉefe de la diverskvalita laboro de la E-istoj en la unuopaj landoj. Ekz. la grandan nombron de la E-istoj en Grekujon atestas ankaŭ aliaj cirkonstancoj.

En multaj artikoloj de la Enciklopedio troviĝas statistikoj. Ilia valoro kaj fidindeco certe ne estas la sama. Ofte ne estis eble kontroli la ĝustecon de diversaj nombroj. Eĉ la preciza membrostato de la societoj en kelkaj lastaj jaroj estas ofte tre malfacile aŭ tute ne konstatebla.

Oni povas multe konkludi el la suba proksimuma »statistiko« pri E en Ĉinujo, kvankam ĝi estas ĉefe nur imagita takso. («Kantona E-Gazeto» jan. 1934.)

1. Adeptoj pli ol — —	300.000
2. Finis kurson pli ol —	30.000
3. Skribas kaj parolas E-e malpli ol — — —	3.000
4. Korekte skribas kaj p. malpli ol — — —	300
5. Verkas aŭ tradukas malpli ol — — — —	30
6. Societoj pli ol — — —	50
7. Librejoj — — — — —	4
8. Bona E-presejo — — —	0
9. Gazetoj — — — — —	5
10. Rubrikoj en ĵurnaloj pli ol — — — — —	10
11. E-instrulbroj malpli ol — — — — —	40
12. Cseh-metodaj kursoj — — — — —	iomete

Staveley (stejvli) Walter Haydn, anglo, profesia pianisto. Nask. 1 jul. 1876 en Preston. E-isto de 1912. Prez. de la E-societo en P.

Stay (stej) Howard, brito, instruisto. Nask. 24 okt. 1897 en Bournemouth. Instruis E-n al laboristoj, kunlaboris al TEPS kaj »Int. Ped. Revuo« red. »Sennacieca Ped. Revuo« (eliris 4 kajeroj, 1930) kaj »The Labour E-Bulletin«, 1931—32. Plenumkomitatano de SAT, 1930—32. Trad. »La Lab. E-ismo« de Lanti al la angla, 1928, kaj »Manifesto de Sennaciistoj«.

Stead (sted) William Thomas, anglo, filantropo, pacifisto, ĵurnalisto. Nask. 5 jul. 1849 en Embleton, mortis 21 apr. 1912 pro submariĝo de la ŝipo Titanic. E-istiĝis pro paroloj de prof. Hartman en Leipzig. En sia gazeto »The Review of Reviews« li energie subtenadis E-n per ĉiumonata pago pri E.

Steche (šte'e) Albert, germano, d-ro de fil., kemiisto. Nask. 9 sept. 1862 en Leipzig. Li fondis fabrikon por oleoj eteraj kaj parfumajoj en Gröba (Saksujo), kaj por floroleoj naturaj kaj artefaritaj en Grasse (Francujo). Deputito de la saksa parlamento 1909—18; vicprez. de la Unuiĝo de Saksaj Industriistoj 1905—20. Terenoj de propagando: parlamento, Teknika Universitato, komerca ĉambró k. a. Jam en majo 1914 pledis en la parlamento por E. Faris por E oficialajn vizitojn, subtenis finance la laboron de la (tiam) Saksa E Instituto. Dum multaj jaroj estis prez. de GEA, ktp. Modesta homo, helpema amiko, fidedla kunlaboranto. Jam en 1921 aperis listo de 39 gazetartikoloj, kiujn li skribis kaj de 7 oficialaj paroladoj, faritaj en eminentaj rondoj. (Detalojn vidu en »La Vendreda Klubo«, eldonita de liaj amikoj en 1921.)

Steche Theodor, filo de St. A., germano, d-ro de fil., lingvisto. Nask. 4 dec. 1895 en Leipzig. Faris festparoladon okaze de la G. E-kongreso en Hamburg, 1931.

Stefan (Olenĉevič S.) sovetiano, instr. de naturscienco. Nask. 1890. Funkciulo de SEU en urbo Ivanovo 1926—30 kaj poste en Aŝĥabad, Turkmena sovetrespubliko en Meza Azio. Spertulo pri instruado de E al infanoj kaj pri organizo de int. lerneja korespondado. Trad. »Ruĝa Talko« de E. Pestun (pri fondiĝo de unua soveto en 1905), 1930. Pli frue, en 1920, ludis certan rolon en laboro de Moskva Domo de E.

Stefanĉič Jakob, sloveno, d-ro, advokato en Beograd. Nask. 1885. Eldonis naciingvajn broŝurojn (1922, 1927), pri politika sistemo laŭ profesioj kaj sindikatoj; prop-isto de libera papermono kun ci-ku-de-igo (S. Gesel). Iniciatis en la E-movado ideologian, sociscienca direktan de l'

Internacianismo. E-isto de 1912, aktiva de 1927. Estis prez. de JEL. Faris radioparoladojn; Fervora gvidanto de »oratora kurso«. Prilaboris en versoj »Servulrajto« laŭ slovena rakonto de I. Cankar »La servulo Jernej kaj lia rajto«. Artikoloj en »La Suda Stelo«. Ĉefkunlab. de Ĉenciklop.

Stejnær (štejner) György, hungaro. ŝparkasoficisto. Nask. 2 aŭg. 1880, mortis 9 nov. 1933 en Győr. E-isto de 1911. Laborado por E antaŭmilitare en Sopron, poste en Győr. Kursoj, paroladoj, artikoloj.

Stejnær (štajner) Hugo, fervoja ĉefinspektoro pens., registara konsilanto (pro eksterlanda prop. por Aŭstrujo pere de E.) Nask. 26 febr. 1878 en Betz. E-isto de 1911. En 1913 komencis gvidi kursojn, entute pli ol 70; i. a. depost 1927 en la polica lernejo Wien. Fondis grupojn en Korneuburg 1914, en St. Pölten 1924. En 1923 fondis la gazeton »Austria E-isto«; red. kaj eld. ĝis nun. En 1924 ĝen. sekr. de AED, prez. 1925—30 kaj de 1933 prez. de AEA. En 1928—29 prez. de E-Unuiĝo en Wien. En 1929 aranĝis gravan Antaŭkongreson en Wien kun inaŭguro de la Int. E-Muzeo, kies fondinto kaj gvidanto li estas. De 1925 ĝis la fino KR-ano, del. ĉe la diversaj UK-j kaj dum la konferencoj Locarno kaj Praha. Kunlaboras por la Int. Konferenco Wien 1934. Je lia instigo la Aŭstria Fervojoj permesis E-kursojn por fervojistoj, (1924); permesis la E-n insignon dum deĵoro (1925); akceptigis en la konferenco de la fervojdirektoj en Brukselo (1927) alprenon de E por la subskriboj en translimaj vagonoj. Je lia instigo (depost 1928) la Ministerio por Komerco kaj Trafiko kaj aliaj faktoroj eldonis gvidfoliojn pri Aŭstrujo kaj Wien en granda kvanto; en 1929 li mem verkis gvidlibron pri Wien, 64 p. En 1930 faris kvarsemajnan varbvojaĝon por Aŭstrujo tra la nordbohemiaj urboj. En 1932 deksemajna varbvojaĝo kun oficiala subteno tra Polujo, Dancigo, Litovujo, Estonujo, Finnlando, Norvegujo, Svedujo kaj Danujo. 48 publikaj paroladoj kun film- kaj lumbildoj pri Aŭstrujo en E kaj paroladoj el Radio-stacioj Kaunas, Riga, Tallinn, Hel-

sinki, Kiruna kaj Oslo. Atingis diversajn sukcesojn por la E-movado en tiuj landoj. Honora membro de UEA, ktp. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Steinhauer (štajnhauer) Hugo, aŭstro-germano, fervoja ĉefinspektoro. Nask. 1878, mortis 9 sept. 1926. Propis speciale en fervojistaj rondoj, gvidis multajn kursojn, faris multajn paroladojn. Prez., poste hon. prez. de UEU-Wien.

Stejskal Stanislav, ĉeĥo, gimn. prof. Mortis 27 dec. 1929 en Praha. Laboris inter blinduloj. Fondinto de SOČNE, 1922. Redaktinto de dumonata gazeto »Aŭroro« por blinduloj prezata per la Braille-a punktskribo (depost 1920).

Stellacci (stelaĉi) Agostino, italo, sacerdoto, prof., eksmilita kapelano kaj nuna kapelano O. N. B. De 1928 gvidis la kursojn de Kampana E-a Instituto. Kunlaboris por »Rivista Italiana di E«.

Stengel (štengel) Friedrich Karl, aŭstriano, germano, fakinstruisto, lerneja inspektoro, »registara konsilanto«. Nask. 15^a okt. 1871 en Wien. Estrarano de AEA. Gvidis preparkursojn por la ŝtata E ekzameno. Verkis lernolibron »Parolekzercaro laŭ bildoj«, 1928, trad. aron da poemoj.

Stenografa Instituto Tutmonda. Celo: disvastigo de la uzado de l' E. Stenografio Duployé-Flageul, kaj de la alfaroj de l' sama sistemo al la naciaj lingvoj. Fondita en 1933. Delegetoj en pli ol 20 landoj. Organo: »Fluganta Skribilo«.

Stenografio. E kiel int. helplingvo faciligas la reciprokan interkomprenon. Per ĝia principa uzo oni liberigas ĉiun int. interrilatadon de la tradicia baŭsto, kaŭzita de la multlingveco. St. kiel skribteknika helpilo simpligas la skriblaboron. Ĝi malŝarĝas la skribanton de la pezeco de la ordinara skribmaniero. E kaj St. estas du raciaj helpiloj de l' moderna vivo.

La St.-istaro ĉiam montris sin tute favora por E. Ĝi multe helpis ĝian propagandon kaj al ĝi alfaris la diversajn stenografii-sistemojn. La unuaj publikigoj okazis en 1896. »L. I.« publikigis artikolon pri la rilatoj, kiuj ekzistas inter E kaj St.

Samtempe »Le Grand Sténographe« kaj »La Gazette Sténographique« en Francujo publikigis kurson. La lasta gazeto eĉ publikigis aldonon »L' Espérantiste« (Paulo de tiu poste publikigita de Beaufront).

En 1897 aperis en Stokholmo la unua lernolibro de E. St., de P. Ahlberg: Stenografio laŭ la principoj de Dro Julius Brauns, E-igita per helpo de V. Brauns el Halmstad, Svedujo.

En 1903. S. de Vries publikigis en Amsterdam la unuan int. revuon por E. St. »La St-isto«. En 1904 li ellaboris sistemon: »Resumo de la St-a sistemo de Vries, prilaborita por la lingvo E«. Sed ĝi restis nur manuskripto. Samjare de Vries kaj D. Uitterdijk publikigis duonmonatan gazeton »Revue Int. de S« kaj fondis Int. E St. Societon.

En la sama jaro Pastro Frederiko Schneeberger en Laufen (Svislando) aperigis 4-paĝan »Resumo de la E St.« verkita laŭ la sistemo de Stolze-Schrey. Dua kaj tria eldonoj de la sama resumo, kun kelkaj sistemmodifoj, eliris ĝis la jarfino. Schneeberger ankaŭ fondis la »E St-a Rondo« por St-a korespondado kaj ekzercado.

La jaro 1905 estas grava en la historio de E St. Schneeberger aperigis sian »Lernolibro de E St. laŭ la unuiga sistemo Stolze-Schrey«. La Svisa S. Societo organizis konkurson en germana, franca kaj E St-oj.

En la 1-a U. K. en Boulogne s/Mer, Schneeberger postskribis la paroladojn laŭ sia alfaro kaj per tio fariĝis la unua praktikisto de debat-st. en E. Liaj st-ajoj servis por kompilo de la oficiala raporto de l' kongreso.

Flavigny kaj Lafaye verkis adapton de Duployé (nur manuskripto).

Aperis samtempe 2 alfaroj por Pitman de Georg Ledger kaj Alfr. Lindridge. Manuskripto de Antonio Sobczynski »Universala sistemo st-a, uzbla en ĉiuj lingvoj« fariĝis konata, same modeloj de E. St. de A. Saponjko.

En 1906 Schneeberger eldonis st. gazeton »Flugila Plumo«, unue hektografite, poste en litografio, de post numero 4, regule kun ekzercoj en debata st. Li plie publikigis sur bazo

de sia praktikado en Boulogne s/M. verkon hektografitan: »Regularo kaj Sigelaro de Kongresa St. (Sistemo Stolze-Schrey)«, W. Häuscholdt alfaris la sistemon Scheithauer.

En la 2-a U. K. en Genève, Schneeberger, Jak, Schmidt (Bern.) kaj Siegfried Auerbach (Frankfurt a/M.) postskribis la oficialajn paroladojn de la kongreso laŭ la sistemo Stolze-Schrey.

St. Societo en Szeged (Hungarujo) por la Int. Kongreso de St. en 1907, akceptis favoran decidon. En la kongreso, Schneeberger kaj Cogen (Ni-nove) ricevis medalon por siaj E. laboroj pri St.

Dum la 3-a U. K. en Cambridge — la 16. 8. 1907 — okazis kunsido de »Int. St. Societo« prezidita de Schneeberger.

Fine dum tiu jaro aperis »Lernolibro de la Natura St. Gabelsberger« alfarita de G. Christofel, kun enkonduko en E. metagrafio.

En 1908 Ch. Barit publikigis propran sistemon: »L' Espero«, kaj Rudolf Sprotte du verketojn: »Simpla st. sistemo« (Charlottenburg) kaj »Aoro« St. internacia. Lernolibro por uzo en la lingvoj E., angla, franca, germana, rusa, hispana. (Berlin).

Pastro Aug. Frohus (Poppenburg-Hannovero) publikigis alfaron de la germana sistemo Scheithauer.

La st. eltrovinto Heinrich Roller (Berlin) aperigis verkon »Kompleta lernolibro de E. st. laŭ la Rollera tutmonda sistemo, uzbla por ĉiuj lingvoj«.

En 1909 A. Creux elvenigis alfaron por Ido de l' sistemo Duployé ĉe la eldonejo Duployé en Paris, kun dua parto de adapto por nia lingvo sub la titolo: »St. Duployé por E«. A. Ruthardt (Mühlacker, Germ.) aperigis sistemon de int. st., ankaŭ aplik-ebla por E. Instruisto W. Wohlra-be Chemnitz, en »Der Unterrichtsleiter«, Liegnitz (majo 1909) publikigis kurson de E. St. laŭ la sistemo de »Nationalstenographie« de fratoj Ku-nowski.

Dum 1910 d-ro A. Schramm eldonis ĉe Heckners Verlag, Wolfen-büttel (Brunsvigo) la E. St. laŭ la sistemo Gabelsberger. Anglo, Josiah

Catton publikigis en London adap-ton de l' Pitman-sistemo.

En januaro 1911 d-ro A. Schramm, Dresden, komencis publikigi la gazon »Int. St. Gazeto Gabelsberger«, organo de la »Int. Ligo Gabelsberger«, kun »St. Aldono« (laŭ la sistemo G.—Schramm). Redaktoro Karp Wallon, Frankfurt a. M.—Sud.

Emil Stark, Magdeburg, post aliĝo de Schneeberger al la Ido-movado, aperigis en 1911 duan senŝanĝan eldonon de la lernolibro de Schneeberger. Li ankaŭ publikigis anstataŭ la malaperinta gazeto »Flugila Stelo« novan organon sub la titolo »Flugila Plumo«; ĝi ĉesis post kelkaj numeroj.

Ŝajnas, ke 1912 estis rezervita al sola aŭtoro L. Jakab, Budapest. De li aperis tri verketoj: »Lernolibro de la plej simpla kaj plej facila St.« Poste: Komparaj tabeloj de la 15 diversaj sistemoj de E. St. kaj E. sono. Statistikoj. Fine: Klopodoj por la E. St. (hungarlingve). Dum la sekvanta jaro K. Ewald publikigis laŭ tiu ĉi sistemo broŝuron »Bildoj el la besta vivo«.

Rob. Kreuz, Frankfurt a. M. (German.) en tiu ĉi jaro diskonigis la unuajn provojn de metagrafio Stolze-Schrey-Schneeberger.

Komence de 1913 P. Flageul, Paris, alfaris la sistemon Duployé al E kaj instruis ĝin en la E grupo en Vanves.

Je Pasko 1913, Rob. Kreuz postskribis la E. alparolojn faritajn en la germana laborista kongreso en Frank-furt a. M. publikigitajn laŭ tio.

Majo: A. W. Lyndridge publikigis »Adaptation of Pitman's shorthand to E«. Junio: aperis en »Le Phare Sténo-graphique«: »Sistemo Duployé por E«, alfarita de prof. Sepulveda Cuadra, Santiago de Chile. Aŭgusto: en »Le Journal des Sténographes« prezento de la »Adaptation de la Sténographie Duployé à la langue internationale E« laŭ la alfaro de P. Flageul. Saman monaton Rob. Kreuz prove stenogra-fis en la U. K. en Bern. Oktobro: Flageul publikigis la »Petite Méthode de Sténographie Espérantiste«; en novembro, li komencis eldoni »Flug-anta Skribilo«, St. monata gazeto.

En januaro 1914 »Le Phare Sténo-graphique« organizis st. konkurson

kun sekcio por la E. St. Duployé—Flageul. 17. 1., Rob. Kreuz 1-a premio (120 silaboj) en konkurso Sachsenhausen. Aprilo: Fluganta Skribilo« organizis sian unuan internacian konkurson de E. St. 3. 5. Kreuz 1-a premio (140 silaboj) en konkurso Oberursel, 14. 6. 1-a premio (150 silaboj) en Fulda. Samjare alvoko al la E. st-oj por la U. K. de Paris, parolado St. Instituto, Milano, Kursoj en Poitiers kaj Praha.

Pro la milito subite ĉesis la agado en tiu ĉi kampo. De 1916—19 »Fluganta Skribilo« reaperis neregule. En 1919 aperis la »Méthode de St. Espér. et de Stén. Franç.« de P. Flageul kaj poŝtkarto kun la alfabeto Aimé-Paris-Lefebvre. En la sama jaro kurso en la Centra Oficejo E. en Paris, skriba, en »Le St. Dact. Moderne«, Paris.

La 9. 12. Kreuz ricevis 1. premion (175 sil.) en Sachsenhausen.

1920. Januaro: aperis verko de Montagu C. Butler: »Raporta St. E-a, alfaro de l' sistemo Pitman,« nun uzata en la oficejo de BEA. 16. 5. Kreuz ricevis 1. premion (160 sil.) en Rödelheim. Aŭgusto: La Int. Kongreso de St. (Buisson), Strassburg, decidis akcepti E. samgrade kiel ĉiujn naciajn lingvojn en la int. Kongr. de St. Dum la ferma kunsido komunikajo kaj diskutado okazis en E.

1921. 3. 10 Kreuz 1. premio (175 sil.) en Höchst a/M.

A. Lefebvre, Paris, publikigis sian alfaron »Provo de St. Int. laŭ la principoj de Conen de Prépéan, Aimé-Paris«.

1922. 7. 5. Kreuz ricevis 1. premion (160 sil.) Bergen-Enkheim.

1923. Starigo de la Int. Asocio de E. Stenografistoj (IAES). La unua cirkulero estis dissendita la 5. aprilo, Rondiranta gazeto la 4. 4. kaj dum julio aperis la 1-a n-ro de »Int. Stisto«, oficiala organo de IAES, kies konstitucia kunveno okazis la 9. 9.

La Konsilantaro de IAES estis elektita dum eksterordinara kunveno, la 9. 3. 1924. Prez. P. Flageul; Vicprez. Cogen, Warden, Chrapusta; Gen. sekr. Marchand; Help. sekr. Bengough, Polaček, Leffler; Kasist.

Lefebvre; Arhiv.-bibl. kaj ĉefred. de I. S. Demarcy; Administr. F-inoj Bonnet kaj Colijn, s-roj Bredall, Omel'skij kaj Popov.

Flageul komencis publikigi sian alfaron de Metagrafio al E. (finita en 1926).

Depoin reprezentis IAES en la Int. Kongreso de St. en Lausanne.

Le Stén. Illustré enhavis alfabeton: Duployé—Flageul.

La 4. 8., dum la franca kongreso pri St. en Charleville estis voĉdonita deziresprimo por E. La »Almanach Sténographique« enhavis adresaron de 114 E. St-oj el 25 landoj. En la Jarlibro de la E. Movado (eld. UEA) aperis artikolo kun specimeno de E. sistemoj. Pluraj kursoj estis organizitaj. Kreuz, Genève, stenografis la ĉefparoladojn en la 17 U. K., publikigitaĵojn en la oficiala dokumentaro.

En majo 1925 la int. Konferencoj por la uzado de E. en Komerco kaj Industrio kaj en Sciencoj puraj kaj aplikitaj, unuanime akceptis deziresprimon prezentitan de IAES pri disvastigo de E. inter st-oj. La eltrovinto Grandjean, Paris, skribis publike E. diktadojn per sia St. maŝino »Sténotype«.

Saman monaton okazis la unua int. konkurso de E. maŝinskrubo, organizita de l' »Association Descartes«: F-ino E. Mitchell, f-ino Gabriel, s-roj Gavrin kaj Trouleure.

Kreuz organizis fakan kunvenon de E. St-oj dum la U. K. en Genève.

T. Mori, Kioto (Jap.) eldonis organon »La Studio St-a«.

W. Wingen, Urbparlamenta stenografo, Köln, starigis alfaron de sistemo Palm.

En majo 1926 la Pariza Foiro organizis int. konkurson de maŝinskrubo en E. F-ino O. Piau venkis.

»La Revue Sténographique Belge« publikigis serion da artikoloj de Cogen-Ninove.

La franca kongreso de St. en Bourges akceptis deziresprimon similan al tiu, akceptita en 1925 de la teknikaj konferencoj.

R. Kreuz kaj M. C. Butler stenografis la paroladojn dum la 18. U. K. de E. en Edinburgh.

Prof. Dyba, Berlin, aperigis origi-

nal-sistemon »Ĉies«. IAES fiksis regularon por konkursoj de St. kaj maŝinskribo. Cogen alvokas per cirkulero por fondo de belga societo de E. st-oj.

La st. fak-organo »Fach-Beilage« (novembro) publikigis dokumentan resumon: Regularo de Debata St. (metagrafio) por E. Laŭ Stolze-Schrey, de Robert Kreuz, Genève. Dum la sama monato Felix von Kunovski, kunaŭtoro de la germana »National-stenographie« eldonis »International-stenografio«, sistemo de st. int. por ĉiuj lingvoj. Gvidilo en E, reviziita de Markau, Potsdam. — En decembro »Deutsche Kurzschrift«, Duisburg, resumis siajn ĉefajn artikolojn en E.

Dum marto 1927, la komitato de la germana skolo Arends decidis el-laborigi alfaron por E.

Cogen fondis la unuan nacian societon: »Asocio de la Belgaj St-istoj-Gee-istoj«. Sekvante tiun ekzemplon, la 5. 6. R. Llech fondis en Paris saman societon »Franca Societo de E-istoj—St-istoj«, tuj post 1-a provo de E. st-ado organizita de »Fluganta Skribilo«.

En la Int. Kongr. de St. en Bruxelles, en aŭgusto, okazis int. ekspozicio, en kiu E. havis plej grandan lokon. Rekompencoj aljuĝitaj: Ora Medalo: IAES, Cogen, Flageul; Arg. Medalo: A. de Maertelaere; Br. Med.: A. Lefebvre; Honora Mencio: Frischknecht, Beaugier.

La 6. 8. okazis la 1-a Ĝenerala Kunveno de IAES en la »Monda Palaco« kaj la 1-a int. kaj intersistema konkurso de St.: V. Hendricx, 140 sil., f-ino O. Piau, 120 sil., R. Llech, 100 sil., s-ino A. Picard, 80 sil. Dum la ferma kunsido okazis diskuto en E. pri la utileco de St. por la E-istoj, post kiu la Kongreso unanime akceptis deziresprimon pri lernado de E. St. kaj edukado de E. St-oj.

En la 19. U. K. en Danzig, en aŭg., R. Kreuz stenografis la ĉefparoladojn; same poste en Antwerpen (1928), Budapeŝt (1929), Oxford (1930), Kraków (1931), Paris (1932).

En septembro R. Llech publikigis la 1-an numeron de »Le Sténographe Espérantiste«.

En tiu ĉi jaro Karp Wallon, Dresden, eldonigis lernolibron de sia alfaro »Rapido« de l' oficiala germana unueca sistemo. R. Haillez, dulingva parlamenta stenografo en Bruxelles, starigis novan alfaron de Duployé, publikigitan en 1928 en »L' Elan« kaj de Maertelaere propran sistemon »Progresemon«. Prof. A. Scheller, Hildburghausen (Germ.) aperigis hektografitan lernolibron de alfaro de l' germana reform-stenohigrafio.

La »Revue Sténographique Belge« regule aperigis E. paĝon. Multaj artikoloj kaj kursoj.

La St. Unuiĝo de Belgujo organizis dum julio konkursojn de St. kaj maŝinskribo en E.

Marto—oktobro V. N. Engelhardt publikigis, ruslingve, en »Int. Lingvo« n-ro 2—5 la principojn de Internacianalstenografio.

De aprilo 1928 Flageul eldonis literaturan broŝureton en E. St. La 1-a estas »Poezioj de Zamenhof«. Aperis 6 kapteroj.

»Der Schriftgenosse«, Halle a/S., junio 1928 enhavis alfaron de E. stenohigrafio de stud. fil. Josef Weber-Graz. »Der Arendische St.«, Berlin tian de la sistemo Arends de W. Wingen, Köln.

La 5. 8. la franca kongreso de St. en La Mans akceptis en la regularo por la atestoj pri profesia lernado kaj kapableco de la st-oj sekretarioj E. inter la fremdaj lingvoj. Dum la kongreso okazis konkurso de E. maŝinskribo. 1-a f-ino O. Piau, 2-a f-ino Maupioux. F-ino Piau sukcesis ankaŭ en St. konkurso en E. 160 sil.

En la aŭg. numero de »Der Schriftgenosse« Halle a. S. E. Lotzing konigis la »E. Tahigrafion« starigitan de Vinzenz Miksche, Wien, en 1912.

La 10. 8. 1928, dum la U. K. en Antwerpen, okazis la 2-a Ĝenerala kunveno de IAES. Estis elektitaj: Hon. prez. Flageul; Prez. Cogen; Viceprez. Lefebvre, Warden, Hoën; Ĝen. sekr. Haillez; Helpsekr. Bengough. Polaĉek, Leffler; Kasist. A. de Maertelaere; Bibl.-Arĥiv. J. Llech; Administrantoj: F-ino Bonnet, s-ro Popov.

La 3-a Ĝen. Kuvn. okazis la 4. 10. 1929, dum la U. K. en Budapeŝt

kaj la 8. 8. okazis faka kunveno de E. St. en la lernejo de Radnai.

Dum septembro, en Budapest, A. Vikár, L. Kökény, Ge-sroj. Grandjean, parolis en E. pri diversaj temoj dum la Int. Kong. de St. Aliaj parolis nacilingve pri E. E. verkoj estis vid-eblaj en la ekspozicio de tiu ĉi kongreso.

Samtempe aperis la »Radnai-St.«, alfaro al E. de Kökény kun helpo de d-ro Adalberto Radnai.

Oktoebro: Quitadamo en Napolo (Italujo) fondis la »Associazione Nazionale Stenografici-Esperantisti«.

Decembro: aperis »Aldono« kaj 1-a parto de Internacinalsten. de Kunovski por hisp., ital., pola kaj rusa lingvoj, reviziita de Hoen, Köln.

En 1930 aperis 2-a parto por dana, nederlanda, portug., rumana kaj latina lingvoj.

La gazeto »Arbeiter-Stenograph«, Lahr i. B. en n-roj 2, 5-6, 7 kaj 8 enhavas alfaron de Arends de Mart. Schäßler-Munheno (1929).

En tiu ĉi jaro aperis la »Originalstenografio por E.« de prof. E. Brabbée, Wien, fama stenografo de Aŭstrio, lernolibro de Brabbée kaj K. Haager.

De l' germana sistem-eltrovinto, Scheithauer, Leipzig, eliris »Plena lernolibro de E. St.« (Rapidskribo).

1930. B. Siegert (Schweidnitz) eldonis ĉe G. Richter-Lahr lernolibron de »E. St. sistemo Arends«. La Germana Ligo de l' »Laboristaj St-istoj« eldonis propagandilon pri E. St.

Kreuz starigis propran alfaron laŭ Stolze-Schrey (febr. 1930) uzatan praktike en la oficejo de ICK kai kurson de metagrafio (okt. 1930).

En februaro estis fondita la »Tutmonda Intersteno-Asocio« (Internacinalstenografio de F. v. Kunovski); samtempe aperis en Duisburg la gazeto »Tutmonda Intersteno« (en tipografio). Redakt. Fr. Graser, Frankfurt a. M. kaj »Multlingva Intersteno« (en Intersteno). Redakt. H. Friesz.

Aŭgusto: Germana Asocio de Nacionalstenogr. okaze de sia kongreso en Karlsruhe, organizis Intersteno-ekspozicion kaj paroladojn pri utilo-eco de E.

Oktoebro: Kreuz starigis adapton de

Gabelsberger—Noë, uzatan en la Itala Esperanto Centro en Milano.

Dum novembro aperis Nombro-Internacinalstenografio de F. de Kunovski kaj d-ro Fr. Höke.

Sub la titolo »Rapida Skribo de Fr. de Kunovski«, reviziita de H. J. Hoen, elvenis metagrafio de »Intersteno«. Ankaŭ V. N. Engelhardt (Omsk), publikigis ruslingve »Internacinalstenografio«. Li de 1929-31 instruis multajn rusojn laŭ tiu ĉi sistemo.

1931. La 6. 6. R. Kreuz, en svisa st. kongreso de l' sistemo Stolze-Schrey en Rūti, ricevis premion por E. Stenografado je rapideco de 220 ŝlaboj.

De julio, la organo de IAES »Int. St-isto«, kiu ĝis nun aperis poligrafite, aperas presite.

En la ĉeĥoslovaca lando de la 23-a U. K. estas legita parolado de d-ro Höke-Elberfeld—Wuppertal pri st.

Dum la Int. Kongreso de St. en Paris (aŭgusto) oni multe parolis pri E. Laŭ propono de la 5-a G. K. de IAES, ĝi unuanime voĉdonis du deziresprimojn; unu al ICK pri organizo de St. ekspozicio kaj konkurso dum la Dudekkvara en Paris, alian al la novfondita Unio Int. de St. pri E. kiel traduklingvo. Tiu lasta estis akceptita de la kongreso.

Dum samloke organizita 2-a int. kaj intersistema konkurso de E. st. estis premiitaj f-ino Piau (140), s-ino Major (100) kaj f-ino Castel (60 sil.).

Fine ekspozicio kun granda fako de IAES. IAES kaj Flageul ricevis ĉefpremiojn; Cogen, Oran medalon.

La Germana Asocio de Nacionalsten. organizis kongreson dum septembro en Detmold. Tie oni parolis pri E. kaj Intersteno.

Dum oktobro laŭ propono de L. Kökény, la st. oficejo de l' hungara parlamento organizis gravan enketon per E. pri la St. en la parlamentoj de la tuta mondo.

Dum decembro Flageul sciigis sian intencon verki Historion de la E. St. kaj akceptis proponon de Kreuz pri kunlaborado.

Samjare 3. parto de Internacinalstenografio, nun adaptita al 22 lingvoj.

En aprilo 1932 André Schild-Basel eldonis adapton de Aimé-Paris. En

junio eliris alfaro de Prévost-Delaunay de A. Eymard, Paris.

La parlamenta stenografi-organo »Der Blitz« Berlin en sama monato komencis publikigon de E. St., ekzercojn de elementa kaj debata St. laŭ Stolze—Schrey—Kreuz.

28. 5. En la Kongreso de Sv. St. Stolze—Schrey en Kreuzlingen estas premiitaj en E. St. Frischknecht, St. Gallen, por 160 sil. kaj R. Kreuz por 240 silaboj. En junio Kreuz starigis alfaron de la dana sistemo Worms (Schrey—Worms) kaj dissendis multobligitan resumon de sia alfaro de Stolze—Schrey.

Okaze de la 24-a U. K. Flageul organizis por IAES ekspozicion en Institut Stén. de France. Tria intersistema E. konkurso. Premiitaj estas F-ino Ch. Ostertag por 80 sil. (Gabelsb.) Maurice Lapéras, 80 sil. (Dupl. Flag.) H. Korell, 100 sil., Langgebrück, (Stolze-Schrey, Schneeb.) Anonimulo, 100 sil., W. Meissner, 100 sil. (Unueca Wallon), F-ino Osterstag, 180 sil., S-ino Sampson-Major (Delaunay-Major) A. Leffler 180 sil. (Gabelsb.) H. Korell, 180 sil.

Jarkunveno de IAES. En aŭgusto, apero de 4-a eldono de Lernolibro de E. St. laŭ la sistemo Duployé de P. Flageul.

Kompilita kaj kompletigita de P. FLAGEUL. Reviziita kaj finredaktita de R. KREUZ.

Stettler Eduard, sviso, Bern. Nask. en Bern 1880 de patricia familio. Lernis E-n en 1908, aliĝis al UEA en 1909 kaj venis Ĝeneven en 1910 por labori dum du jaroj libervole en la modesta oficejo de UEA. — La kvalitoj de St. estas felica kompletigo al tiuj de Hodler kaj ambaŭ reprezentis en rimarkinda maniero la svisan karakteron. Al la intuicio kaj iniciatemo de Hodler, St. alportis la svisan prudenton, trankvilan prijuĝon, kelkfoje embarasigan ĝisfundecion. Juristo klarvida, li tuj komprenis la malfortecon de la strukturo de la movado kaj en la kadro de UEA serĉis realigi tion, kion li spertis en aliaj socioj ĉe kiuj li kunlaboris libervole. Lia nomo do aperis kiel sobra realigisto de eblecoj fareblaj. Liaj raportoj legataj nur de malplimulto

en la movado, ankoraŭ nun estas fonto de utilaj pensoj, spertoj kaj observoj. — St. estis vicdel. de UEA en Bern ĝis 1910, komitatano de UEA, poste vicdirektoro ĝis 1919, direktoro kaj fine prezidanto de la Asocio de 1920 ĝis 1924. (La roloj de direktoroj estis ĝis 1920 honoroficaj). — La komitato elektis lin honora prez. 1924, kiam pro grava malsano de St., d-ro Privat akceptis la prezidantecon. Reelektita en 1928 kiel prez. St. rezignis sian oficon en Stockholm 1934 pro solidareco al kunlaborantoj ne elektitaj en la novan komitaton de la Asocio. — Plurfoje St. estis prez. de la Svisa ES. Okupiginte en la du organizadoj pri la gvido, li verkis la statutojn de UEA de 1920 kaj 1934, biografion de Hodler, kaj, krom kelkaj literaturaj tradukoj, grandan nombron de priaferaj artikoloj en la gazeto »E'.

Stevenson (sti'vensn) Robert, skoto, hemiisto analiza (fero, ŝtalo). Nask. 8 aŭg. 1874 en Coatbridge. E-isto N-ro 12470 de 1905. Prez. de Skota EF, 1925—27. Del de UEA de 1910. Instruis E-n dum 20 jaroj.

Stewart (stju'rt) Charles, anglo. Nask. 1844 en London, mortis 5 nov. 1911 en L. En 1874 eldonis cifero-lingvon »Int. Correspondence by means of Numbers«, cititan en F. K., p. 262. E-istiĝis en 1906. Verkis aŭ tradukis: »Boks kaj Koks«; »La Antaŭdiro«; »La Nevo kiel Onklo«; »Bombasto Furioza.«

Steyrermühl Verlag Wien eldonanto de Tagblatt Bibliotek (v.).

Stilo E-a (principoj kaj difino). Jen la principoj, kiujn donis Th. Cart, en sia supera kurso en la Sorbono:

1. E estante kapabla ĉion esprimi, devas unue esti plej facile akirebla de mezinstruitaj homoj.

2. Logiko helpas igi lingvon facila, sed ne absoluta. Ĝi devas, laŭ la supra principo, cedi se bezone antaŭ iaj lingvaj kutimoj komunaj ĉe Eŭropaj popoloj, kaj kiujn E tute ne celas korekti.

3. La principo de internacieco, kiam ĉi tiu estas absoluta, devas do ĉiam superi ĉiujn aliajn.

4. En E estas nur: a) unu stila regulo: skribi plej klare. Kio estas klara,

tio povas esti nekorekta, sed neniam malbona; b) unu malpermeso: skribi malklare. Kio ne estas klara, tio povas iafaje esti korekta, sed neniam bona.

5. Ekster la supraj reguloj estas nur personaj opinioj aŭ kutimoj, ofte interesaj kaj respektindaj, eĉ uzindaj kiel modeloj, sed kiuj ne povas esti trudataj kiel leĝoj.

Tiuj ĉi principoj devas esti skribataj per oraj literoj antaŭ la okuloj de ĉiuj lernantoj de niaj E-aj kursoj kaj por ĉiam devas esti gravuritaj en la memoro de niaj instruantoj.

Aliflanke jen kion skribas pri E-a stilo Johana Zschepank: »Kio estas stilo? Stilo estas sekreto. Kia estu la stilo? Nerespondebla demando — la kvalitojn de sekreto oni ne povas antaŭdifini! Ĉiu aŭtoro havas sian stilon, ĝi estas lia posedaĵo, lia propraĵo. Li skribas kaj verkas laŭ impulso, ne demandante: kia devas esti mia stilo? ... Stilo estas melodio. Stilo estas ritmo. Stilo estas koloro. Tial ni E-istoj **double** rajtigite parolas pri int. stilo. Ankaŭ ĝi havas ritmon. Ritmo, kiu ne multe estu influata de la nacia stilo de la aŭtoro; ritmo nova, kiu estigas, kiam la verkisto pensas kaj sentas en la int. lingvo, en nia melodio E. La ritmo de verko estas kundecidiga por ĝia beleco«

Resume: Nia lingvo havas sian propran stilon kaj individuan esprimmanieron, kies ĉefa kondiĉo estas klareco. En E. oni devas esprimi tion, kion oni volas diri, tiel klare kaj logike, ke la E-istoj ĉiunaciaj, **kian** ajn gepatran lingvon ili parolas, tuj kaj senerare povas kompreni la diritaĵon.

STAMATIADIS, Nova gram. libro.

Observante la evoluon de E. S. ĝenerale, oni povas distingi tri evoluoperiodojn.

La unuan oni povas nomi epoko de naciaj stil-influo. En ĉi tiu periodo la lingvospirito diverĝis laŭ la nacieco de la verkistoj, kiuj malgraŭvole enportis la influon de sia patrolingvo, kvankam oni plejofte uzis stilon intence platan, sekan, senkoloran, por esti internacia. Kompreneble ĉi tio rilatas al la ĝenerala stilo,

ne al unuopaj elstaraj verkistoj (Zamenhof, Grabowski), kiuj estis poliglotoj, kaj jam dekomence klopodis sendependigi la lingvon de unuflankaj influoj. En ĉi tiu periodo alterne superregis diversaj naciaj influoj (rusa, germana, franca); ĉi tiu alternado rezultigis egaligon, internaciigon, preparante tiel la duan epokon de la E. S.

La dua epoko estas la epoko de l' lingva internacieco. En ĝi ĝeneraliĝas la oboe al la postulo, kiun Zamenhof eldiris jene: »La S. E. ne imitas blinde la stilojn de aliaj lingvoj, sed havas sian karakteron tute specialan kaj memstaran, kiu ellaboriĝis en la daŭro de longa praktika uzado de la lingvo kaj pensado en tiu ĉi lingvo longe antaŭ ol la lingvo estis publikigita. La vera S. E. estas nek slava, nek germana, nek romana, ĝi estas — aŭ almenaŭ devus esti — nur stilo simpla kaj logika. Tamen ĉio devas esti en ĝusta mezuro. Ankaŭ en E. troviĝas diversaj (ne multaj) idiotismoj, kaj tute malprave kelkaj E-istoj ilin kontraŭbatalas, ĉar lingvo absolute logika estus lingvo tute senviva kaj tro peza«. Kompreneble ĉi tiu stilo ne povas esti ĝenerala; ĉiu nova E-isto ja trapasas individue la samajn evoluogradajn, kiujn faris la lingvo mem kaj nur post pli-malpli longa uzaĵo alproprigas la veran E-an stilon, propraspiritan, supernacian, ekvilibrantan. Sed ĉe la bonaj E-verkistoj ĉi tiu stilo jam iĝis subkonsciaĵo, ĝi havas siajn proprajn, asimilitajn idiotismojn, ĝi estas la stilo de bonaj gazetoj, facila literaturo, propagandaj, popularsciencaj artikoloj. Ĝi estas, laŭ Kalocsay, tiu »kanvaso, sur kiu oni povas brodi«, alivorte, ĝi ebligas la trian epokon: evoluigon de E. por la plej altaj literaturaj kaj poeziaj bezonoj, samrangigon de E. al la naciaj lingvoj literaturaj.

Ĉi tiun trian epokon, kiu rilatas nur la lingvon de alta literaturo kaj poezio, oni povas nomi epoko de lingva artismo. Apenaŭ ŝajnas necese pruvadi, ke rilate ĉi tiun lingvon, kiel Kalocsay diras, »oni ne povas apliki la samajn postulojn de praktika simpleco kaj vortmalriĉo kaj facileco je ĉiu kosto, kiuj validas (kaj nepre

devas validi) en la vulgara lingvo. «Car ĉi tie ja validas aliaj celoj: kolorvaloro de vortoj, esprim-energio de songrupoj, delikata flekso de nuancoj, elvokivo de vortoj laŭ sonenhavo kaj de frazoj laŭ vortsituacio kaj sencritmo ktp. Kiel ekzemplojn de ĉi tiu stilo mi povus menciŭ lokojn el Anni kaj Montmartre (de Schwartz), el Cikoni-kalifo de Babits kaj Norda Vento de Karinthy (de Bodó), el La sorĉistino el Kástilio de Asch (de Lejzerowicz). Mi mem provis precipe en la traduko de la Mitologio de Babits (Hungara Antologio) respondi al la ĉirilataj postuloj de l' originalo. En la poezio, Kalocsay estas la ĉefrepresentanto de ĉi tiu stilo (Streĉita Kordo, Eterna Bukedo, Goethe-tradukoj, Hungara Antologio, Infero de Dante). Komprenible tiuj, kies lingva nepreteco aŭ animstrukturo estas baro kontraŭ la kompreno kaj takso de stilvaloroj kaj kolorpomo, rigardas ĉi tiujn klopodojn malaprobe, eĉ malamike. Diskuti kun ili estas same neeble, kiel paroli al blindulo pri koloroj. Sed oni povus fari la saĝan kompromison: 1. la riĉiĝo postulata de l' supraj principoj koncernu nur la lingvon de poezio kaj alta prozo; 2. la stilsimplistoj lasu al la poetoj liberan manon suvr terenoj, kiuj ilin ne koncernas.

TOTSCHÉ.

Stockholm. Ĉefurbo de Svedujo; 487.675 loĝantoj. 26-a UK 4—11 aŭg. 1934; taŭga atmosfero, akraj debatoj gravaj ŝanĝoj en UEA.

Stockton Samuel D., usonano, instruisto, poste bienvendisto en Oakland (Cal.) Nask. en 1857, mortis 24 jan. 1926. Testamentis 2500 dolarojn al E-societoj.

Stojan Petro E., ruso. Nask. 22 junio 1884 en Ismail, Besarabio. Li studis en Riŝeljea Liceo en Odessa, poste (fizik-matematikon) en Odessa kaj Peterburgo, fine en 1906—07 en Paris. En 1919—22 li estis prof. de liceo en Serbujo. De 1925 kolkajn jarojn li profesie laboris ĉe UEA por bibliografio. Al E li aliĝis en 1903. Li estas unu el la veraj kompetentuloj pri vortara tekniko. Dum 16 jaroj li laboris por 12 vortaroj (inter

aliaj por la granda rusa vortaro de la Imperia Akademio) kaj famaj estas liaj Ornitologia oklingva vortaro, 1911 Rusa-E Vortareto, Ilustrita Vortaro de la rusa lingvo (760 paĝoj kaj 2000 bildoj). En 1930 aperis lia granda »Bibliografio de Int. Lingvo« (v.) Krom tio li eldonis en E multajn valorajn sciencajn artikolojn kaj originalajn literaturajojn. L. K. de 1914.

Straaten van, Antonius Gerardus Johannis, nederlandano, Iernejestro kaj prof. de angla lingvo en Nijmegen. Nask. 6 dec. 1887 en Vianen. Verkinto kaj gvidanto de la skriba E-kurso eld. de CEPC, unua eld. en 1925, ĉiujare nova eld.; ankaŭ peradiere uzata. Verkis N-E kaj E-N vortaron, 1933.

Stranga Heredaĵo. Romano originale verkita de H. A. Luyken. 1922, 320 p. Tendencromano kun multaj aludoj al E, mem la heroo de la romano estas eminenta E-isto, kiu havas detektivajn kapablojn. La enhavo: amrakonto, aventuroj, vojaĝpriskriboj.

Stratoj kaj monumentoj. Jen estas la listo de ĉiuj stratoj, placoj, monumentoj, tabuloj troviĝantaj en la tuta mondo honore de Z aŭ E. Tiu ĉi listo tamen ne estas plena. Ĝi nur prezentas tiujn urbojn, pri kiuj mi posedas fidindajn dokumentojn kaj informojn. Ekzistas ankoraŭ aliaj urboj kun stratoj aŭ placoj de Z. Ne povante doni pri ili detalajn informojn aŭtentikajn, mi kontentigos per citado de ties nomoj. »Pola E-isto« N 1 de 1934 mencias krome laŭ la »Brazila E-isto« la jenajn urbojn: Castellon de la Plana (Hisp.), Matadepera (Hisp.), Vinaroĉ (Katalun.), Viroflay (Fr.) Sekve ĝi mencias krom la 42 urboj cititaj en la tabelo ankoraŭ 4 urbojn. Laŭ tre fidindaj fontoj mi scias ankoraŭ pri la jenaj urboj: Barnaul (Sovet.), Santander (Hisp.), Tel Aviv (Palestino), Tiflis (Sovet.), Vitebsk (Sovet.). Sekve kune 51 urboj. Se ni kunigos tiun nombron kun la nombro de aliaj urboj, kie E estis iel ajn distingita, entute ni havos 54 urbojn, kie E aŭ Z estas speciale honorata, kaj tio atestas pri la sukcesoj de E en diversaj regionoj.

Urbo (lando)	Oficiala nomo (ekde kiam)	Antaŭa nomo	Komenco kaj fino ĉe str.
Amiens (Francujo)	Rue Zamenhof (24 VI 1931)	Chemin de la Falaise	Octave Thierce. Sur la kamparo.
Aracaju (Brazilo)	Rua Esperanto (23 III 1932)	—	—
Arnhem (Nederlando)	ESPERANTOLAAN (23 VII 1934)	Velperweg	Velperweg N 140 Schaapsdriift N 185
Bad Neuenahr (Germanujo)	Dr Samenhof-Platz	—	—
Barcelono (Katalunujo)	Carrer del Dr Zamenhof (14 IV 1932)	Carrer 19	Av. del 14 d' abril. Carretera de Sarrià.
Bjalistoko (Polujo)	Ulica Zamenhofs (11 VI 1919)	Ulica Zielona	Rynek Kościuszki. Ĉe l' rivero.
Bor (Haida) (Ĉ. S. R.)	Zamenhofgasse	—	—
Boulogne sur Mer (Francujo)	Place L. Zamenhof (3 II 1931)	Pl. de la Gare	Apud la stacidomo.
Bratislava (Ĉ. S. R.)	Zamenhofova ulica Zamenhof Gasse (1930)	Ne ekzistas	En kvartalo VI.
Brzeziny (Polujo)	Rynek im Zamenhofs (13 V 1931)	Rynek	Piśsudskiego. Kościuszki.
Cagnes sur Mer (Francujo)	Rue Dr L. L. ZAMENHOF Auteur de l' Esperanto 1859—1917 (25 XII 1933)	Ne ekz.	Av. de la Gare. Av. des Reynes.

Urbo (lando)	Oficiala nomo (ekde kiam)	Antaŭa nomo	Komenco kaj fino ĉe str.
Cannes (Francujo)	RUE du Docteur ZAMENHOF Créateur de l' Esperanto 1859—1917 (18 VI 1933)	Rue de la Prairie	Bd. d' Alsace prol. Promenade de la Croisette Nr 63.
Cassà de la Selva (Katalunujo)	Carrer de Zamenhof (1932)	—	—
Clamart (Francujo)	Rue Zamenhof	Rue de Vanves	—
Dancigo	1. ESPERANTOWEG 2. ESPERANTOGRUND (31 VII 1927)	Ne ekz.	1. Grenzlauerweg. Esperantogrund. 2. Esperantoweg. La arbaro.
Drahovice (Ĉ. S. R.)	Esperanto-Strasse (9 II 1926)	Ne ekz.	Ĉefplaco. Burglernejo.
Dresdeno (Germanujo)	Zamenhofstrasse (1927)	—	Bebelstrasse. Pirnaer Landstr.
Düsseldorf (Germanujo)	Samenhofweg (21 II 1933)	Ne ekz.	Bertastr. Karlsbaderstr.
Issy les Moul. (Francujo)	Rue du Dr. Zamenhof Créateur de l' Esperanto 1859—1917 (I 1933)	Ne ekz.	Rue du Chemin Vert. Rue Emile Duployé.
Kovno (Litovujo)	ZAMENHOFO Gatvė (1925)	Pazu gatvė	Vilniaur g. N 21. Nemuno kranto g.
Krakovo (Polujo)	Ulica Dr. Ludwika Zamenhofa (2 VIII 1931)	Ul. Niecala	Ul. A. Potockiego N. 6. Ĉe la fervojo.

Urbo (lando)	Oficiala nomo (ekde kiam)	Antaŭa nomo	Komenco kaj fino ĉe str.
Libavo (Latvujo)	ESPERANTO iela (7 XI 1932)	Jana ielā	Kr. Barona ielā Preĉu iela.
Lodzo (Polujo)	Ulica Imienia D-ra Zamenhofs (18 V. 1920)	Ul. Rozwadowska	Ul. Piotrkowska 127. Zeromskiego 86.
Malakoff (Francujo)	rue Zamenhof (1934 ?)	(Rue de Clamart	—
Milano (Italujo)	Via Ludovico Lazzaro Zamenhof (1921)	Ne ekz.	Via Giambologna 43. Via J. Brioski 17.
Montebeliard (Francujo)	rue Zamenhof (8 VIII 1933)	Ne ekz.	Rue Risler 12 En kampoj
Mullhouse (Francujo)	Rue Docteur Zamenhof (7 I 1933)	Ne ekz.	Bd. des Alliés. Rue de la Harpe.
Nové Zámky (Ĉ. S. R.)	Zamenhofova ulica Zamenhof utca	—	—
Olomouc (Ĉ. S. R.)	Ulice Dra Zamenhofs (27 VI 1932)	Ne ekz.	Ul. Prostejovska, Ul. u. Botanické Zahrady.
Rio de Janeiro (Brazilo)	Rua Zamenhof (31 X 1917)	Rua Maria José	Rua Haddock Lobo. Rua Maria Lacerda.
Realengo (Brazilo)	Rua Esperanto (5 X 1913)	—	—
Sabadell (Katalunujo)	Ronda del Dr ZAMENHOF (1912)	Ronda del Norte	—

Urbo (lando)	Oficiala nomo (ekde kiam)	Antaŭa nomo	Komenco kaj fino ĉe str.
Saint Raphael (Francujo)	Rue du Docteur Zamenhof Creatur de Esperanto (1859—1917)	Rue de la grande batterie	R. de la Corniche d' or Av. des chèvres feuilles
San Feliu de G. (Katalunujo)	Carrer de Zamenhof (29 VI 1914)	San Isidro	Ĉe la promenejo. Ĉe la stacidomo.
Sródborów (Polujo)	Ulica Zamenhofs (1931)	Ne ekz.	Ul. Narutowicza. Ul. Krasinskiego.
Sotteville l. R. (Francujo)	Rue Zamenhof (24 V 1914)	Rue de l' Aurore	Rue Hiacynthe Menager. Bd. 14 Juillet.
Terrassa (Katalunujo)	Placa de Zamenhof (1912)	P. de Saragossa	Nord. Sant Pere
Valencia (Hispanujo)	? ? ? (5 VIII 1934)	?	—
Varsovio (Polujo)	Ulica Dr. Ludwika Zamenhofs (24 II 1931)	Ul. Dzika	Ul. Nowolipki 6. Ul. Nizka 29
Vendrell (Katalunujo)	Carrer de Zamenhof (1933)	C. de la Baixada	—
Vieno (Aŭstrujo)	ZAMENHOF GASSE (7 VII 1929)	Ne ekz.	Rauchgasse. Wilhelmstr.
Vich (Katalunujo)	Carrer del Dr. Zamenhof (30 XI. 1932)	Ne ekz.	Carrer 14 d'Abril 45. C. Manllen 46.

Klarigaj tabuloj; rimarkoj.

Amiens. Speciala tabulo klarigane ekzistas. Nur la strataj tabuloj portas la surskribon: Rue Zamenhof, 1859—1917.

Arnhem. Ambaŭflanke de la fervojo troviĝas tabuletoj kun jena teksto: Atentu, Fervojo. Post la transiro fermu la barilon.

Bjalistoko. Sur la domo, kie naskiĝis Z. (angule de la str. Zamenhofs Nr 24 kaj de la str. Biala Nr 4) troviĝas ekde 7 VIII 1927 tabulo el nigra marmoro kaj oraj literoj kun la jena dulingva (pola kaj E-a) teksto: »EN TIU ĈI DOMO NASKIĜIS LA 15 XII 1859 LA AUTORO DE LINGVO INTERNACIA ESPERANTO Dr. L. L. ZAMENHOF.

La fenestro de l' ĉambro, en kiu naskiĝis Z, troviĝas sur la unua etaĝo, eliras sur la korton, plej dekstra (lasta) la malfermita. Stuparo ekstera gvidas el la korto al tiu subtegmenta ĉambro. Nuntempe loĝas en tiu domo samideano, kiu gardas memolibron, en kiun enskribas siajn nomojn la vizitantoj de tiu domo.

Boulogne. Estas tiu placo, kie dum la unua U K loĝis Z ĉe A. Michaux.

Bratislava. La strat-tabuletoj en tiu urbo estis en tri lingvoj: slovaka, germana kaj hungara. Fine de 1933 oni forigis la hungaran surskribon.

Dancigo. Tabulo enmetita en ŝtonaron (nigra kun helaj literoj, en lingvoj E-a kaj germana):

Esperanto Grund

Jubilea kverko plantita de la partoprenantoj de la XIX Universala Kongreso de Esperanto en Dancigo kaj Zoppot por la memoro de la 40 jara ekzisto de la Internacia lingvo Esperanto 31 julio 1927.

La radikoj de la kverko estis dum la plantado superŝutitaj per tereroj el ĉiuj landoj. Speciale tiajn alsendis la E-istaro. — La strato kaj la placo situas en la fama Schmierauertal.

Drezdeno. Tabulo germanlingva (50×30 cm.) Ludwig Lazarus Zamenhof, Arzt, Erfinder der Weltsprache Esperanto, geb. 1859, gest. 1917. (Signifas: L. L. Z., kuracisto, inventinto de la mond-lingvo Esperanto, nask. 1859, mort. 1917.)

Kaŭnas. La strato, kvankam modesta, estis elektita pro tio, ke tie loĝis la patro de s-ino Klara Z. Ankoraŭ nun troviĝas tie apoteko, apartenanta al s-ino Kotzin, fratino de s-ino Klara Z.

Krakovo. Sub la strata tabuleto (en la komenco de la strato) troviĝas tabulo kun pollingva teksto: »Na Pamiatke Światowego Zjazdu Esperantystów Rada m. Krakówa uczčila twórcę Esperanta, oznaczając te ulice jego nazwiskiem. Sierpien 1931.« (Signifas: Je memoro pri la U K de E. La konsilantaro de la urbo Krakovo honoris la kreinton de E, signante tiun ĉi straton per lia nomo. Aŭgusto 1931.)

Lodzo. Sur la angula domo de la str. Nr 1 troviĝas ekde sept. 1930 tabulo dulingva (pola kaj E-a) kun la jena teksto: AL Dr L. L. ZAMENHOF, AUTORO DE ESPERANTO, NASK. EN BIALYSTOK EN 1859 J. MORTIS EN WARSZAWA EN 1917 J. IV TUTPOLA KONGRESO DE ESPERANTISTOJ EN LODZ, SEPTEMBRO 1930.

Milano. Speciala tabulo ne troviĝas, sed el la kvin strat-tabuletoj tri portas la plenan nomon de la strato, nome: »Via Ludovico Lazzaro Zamenhof, fondatore della lingua Esperanto 1859—1917.«

Nové Zámky. La stratnomoj estas en slovaka kaj hungara lingvoj.

Olomouc. Klarigaj tabuloj estas fiksitaj ĉe la komenco kaj la fino de la str. En la parko troviĝas E-arbo kaj apud ĝi E-memorŝtono, sur kiu estas gravurita E-lingve la historio de tiu arbo (plantita 15 V 32).

Sotteville. Sur kelkaj strat-tabuletoj estas menciitaj: Rue Zamenhof, Auteur de Esperanto.

Varsovio. Sur la domo Nr 9, angule de str. Pawia, [kie Z loĝis dum 17 jaroj — v. Dzika 9.] troviĝas blank-marmora tabulo [1 m×70 cm.] kun la jena pola teksto: W TYM DOMU MIESZKAŁ DR LUDWIK ZAMENHOF UR. 1859 ZM. 1917 TWÓRCA MIEDZYNARODOWEGO JEZYKA ESPERANTO. Internacia Esperanta Postkongreso Varsovio 9 VIII 31 (Signifas: En tiu ĉi domo loĝis Dr L. Z. nask. 1859,

mort. 1917 Kreinto de internacia lingvo E.-Intern. E. Postkongr. ktp.)

Ne la tuta strato Dzika estas alinonita je Z-a, nur ĝia unua duono. La resto portas ĝis nun la nomon Dzika kun ŝanĝitaj numeroj.

Vieno. Sur la dom-muro de Hotelo Hammerand (VIII, Florianigasse 8) troviĝas marmora malhela tabulo kaj oraj literoj kun la jena teksto germanlingva: Dr Lazar Ludwig Zamenhof 1859—1917 dem die Menschheit die Hilfssprache ESPERANTO zu verdanken hat, wohnte in den Jahren 1886 und 1887 in diesem Hause.

(Signifas: Dr L. L. Z. 1859—1917, al kiu la Homaro dankŭludas la help-lingvon E, loĝis en la jaroj 1886 kaj 1887 en tiu ĉi domo.)

Monumentoj:

Sur la Tombo de Z en Varsovio (v. Monumento de Z.)

Franzensbad (Františkovy Lázně) — Ĉ. S. R. — troviĝas en la parko, el artefarita ŝtono, inaŭgurita en 1914, en majo dum Kongreso de Aŭstrujaj E-istoj.

Bergen-op-Zoom, Nederlando. Staras ekde 1 III. 1932 en la popolparko. Sur la frunta parto, mal-supre estas nigra tabulo kaj sur ĝi per blankaj literoj E-lingve: »HONORE DE DRO ZAMENHOF AUTORO DE LA LINGVO ESPERANTO 1859-1917.«

Bjalistoko. Estis inaŭgurita en 1931 post la UK en Krakovo: Turo Babel (ankoraŭ ne finita).

Tabuloj de Z (krom la jam cititaj inter la stratoj Z-aj):

Genevo, ĉe str. Rue du Vieux Collège 10, marmora griza (60×45 cm) E-lingva teksto: »EN TIU DOMO LOGIS EN 1905 L. L. ZAMENHOF INICIATORO DE LA LINGVO ESPERANTO.«

Berno, — malkovrita en 1925.

Aliaj tabuloj:

Budapest. En la amuzpalaco estas alfiksita sur la muron granda marmortabulo kun E-a kaj hungara teksto: »La XXI-a Universala Kongreso de Esperanto al la memoro de Grafo Stefano Széchenyi. Internacian honor esprimon al la »plej granda hungaro«, kiu pledis por kompilado de

Internacia Lingvo en la Hungara Scienca Akademio la 27 novembro 1842. Budapest, 1929, 2—9 aŭgusto. — En la skolta parko staras malgranda memorŝtono kun E-a surskribo je la memoro de la E-ista Skolta Tendaro 1931.

Novy Bohumín (Ĉ. S. R.) estis inaŭgurita 4 XI. 1934 memorŝtono en la urba parko. La ŝtono havas stelon kaj surskribon en ĉeĥa, pola, germana kaj E-lingvoj: »Per E al interfratiĝo de popoloj!« La monumento estis starigita de Regiona Ligo E-ista en Ĉes. Tešín.

Varsovio, ĉe str. Hoza 42. Enmurigita inter la fenestroj de la unua etaĝo, super la pordego, tabulo el blanka marmoro kun granda verda stelo kaj nigraj literoj. Teksto pola: »W TYM DOMU MIESZKAŁ INŻ. ANTONI GRABOWSKI NIESTRUDZONY KRZEWICIEL IDEI JEZYKA MIĘDZYKRAJOWEGO GENIALNY TŁUMACZ »PANA TADEUSZA« I IN. ARCYDZIEL LITERATURY POLSKIEJ NA ESPERANTO. VI Wszechpolski Zjazd Esperantystów, Warszawa 5 VI 1933r.« (Signifas: En tiu ĉi domo loĝis ing. A. Gr. senlaca pioniro de la ideo de L. I. genia tradukinto de »Sro Tadeo« kaj al. ĉefverkoj de la pola literaturo je E. VI tutpola Kongreso de E-istoj, Varsovio 5 VI 33.)

Noto. En la kunmeto de la materialo kunlaboris G. Avril, O. Bujwid, S. Comella, C. Cresp, D. Dalmau, V. Haignéré, T. Indra, J. Kailer, S. Kamaryt, A. Klein, A. Kudela, V. Lluis, P. Meazzi, Mizes, L. Moitié, W. Pfeiffer, J. B. Robin, P. Tarnow, kiuj preskaŭ ĉiuj estas delegitoj de UEA. E. WIESENFELD.

Strazds Krišjanis, latvo, posedanto de lanteksejo. Nask. 1891. E-isto de 1913. UEA-del. en Jelgava de 1922. Verkis kaj eld. la unuan pli ampleksan lernolibron por latvoj, 1924 (BIL 2808a).

Streĉita Kordo. Originala poemaro de Kalocsay. 1931, 189 p. »Post la »Parnaso de l' Popoloj« ne aperis poemaro tiel interesa por poeziamanto, tiel grava laŭ stila kaj arta vidpunktoj. Plej admirinda estas la va-

rieco en la poemformoj.» (G. S. ,E', 1931, p:144).

Streĉkova Marie, ĉefino. Nask. 9 febr. 1891 en Brno. E-isto de 1927. Preĉipe aktiva en radio, ofte parolas en Radio-Brno, unuan fojon en apr. 1931, de kiam E-disaŭdigoj el Brno restis oftaj.

Stroele (ströle) Georges, (ps. Goso), sviso prof., (duagrada instruisto). Nask. 18 febr. 1879 en Couvet. Ano de socialista partio, laboras por instruistaj asocioj ktp. Dum jaroj estro de la loka grupo. Gvidis multajn kursojn. Prez. de la Ekzamena Komitato de SES. L. K. Ĉefa recenzanto en ,E' (UEA). Tradukaĵoj en ,E', en ,La Revuo', ktp. Kunlaboranto de la Enciklopedio.

Stroele, el recenzista gildo
Karesas ame ĉiun belon,
Kvankam atentas la nivelon,
Recenzas li kun kora mildo.
(Kalocsay, Rimportretoj.)

Stromboli Alfred, italo, d-ro. Estis prez. de Genova EU, kaj IEA, red. de »I. E-isto«, ano de ICK. Verkis prop-ilojn, lernolibron (1911), kunlaboris je E-gazetoj. Ampleksa laboro.

Struska Hans, aŭstro-germano, lernejdirektoro en Vieno. Estis Volapük-isto, en interrilato kun Schleyer. Laboris por E en Organizo de Ofic-havantoj-Wien kaj en la landa organizo en diversaj funkcioj.

Struvelpetro. De Hoffmann, el la germana trad. Applebaum. 1921, 24 p. Beletaj rakontoj, komikaj bildoj. Porinfana verko, tre disvastigata en Germanujo. Sed peza traduko.

Stuart-Menteth (Stjuat mentith') Charles Granville, anglo, instruisto de angla lingvo. Nask. 26 nov. 1868 en Malvern. E-istiĝis 1902. Verkis: Angla kaj E-a Etimologio, kaj multajn gazetartikolojn.

Studentoj. Tuj post la ekesto de E ĝi trovis adeptojn inter la studentoj. Z mem jam kiel studento laboris por la solvo de la int. lingvo kaj liaj kolegoj estis samtempe ankaŭ la unuaj E-istoj.

En la antaŭmilita movado la studentoj havis sufiĉe gravan rolon, sed apartan organizaĵon dum daŭra tempo **ili** ne havis, ankaŭ la gazetoj »La E-a Studento« (1906), »The E Stud-

ent« (1908), ktp. havis nur efemeran vivon. Mem la E-istaj societoj tre atentis la propagandon inter la studentoj kaj tiucele aranĝadis ofte specialajn kursojn. Kelkloke ekzistis apartaj grupoj kaj kluboj kaj jam en 1909 oni fondis Int. Studentan Ligon en Praha.

Post la milito komenciĝis nova periodo tiutempe estis kreataj la unuaj katedroj de E en diversaj universitatoj (v.), kiuj pligrandigis la nombron de la studentaj E-istoj kaj plirapidigis la fondon de apartaj studentaj E kluboj. En 1926 la Int. Studenta Ligo en Warszawa havis 16 klubojn, kiel siajn anojn, sed la kunlaboro inter ili ne estis kontentiga.

Gravan instigon donis al la movado la studenta fakkunveno dum la UK en Budapeŝto en 1929, kie oni decidis fondi novan studentan E-istan ligon. La preparajn laborojn faris la St. E-ista Klubo en Zagreb kaj tiel ekestis kaj funkciis dum du jaroj la Studenta Tutmonda E-ista Ligo (STELO), sed ĝi limigis sian laboron nur al konsilioj, moralaj helpoj kaj kelkaj praktikaj servoj. Dum la UK en Kraków, 1931, oni akceptis la projekton de la prez. Lapenna Ivo, ke ĉiujare la studentaj fakkunvenoj dum la UK komisiu al unu el studentaj kluboj, por funkcii kiel centro por la E-istaj studentoj. Kiel centro estis elektita la Klubo en Zagreb, (Primorska 11), kiu plenumas tiun devon ĝis hodiaŭ. La taskoj de la centro estas: 1. kunligi la E-istajn klubojn, 2. helpi al novorganizotaj kluboj. 3. eldoni duonjaran raporton, 4. funkcii kiel reprezentanto de la studentaj E organizaĵoj en ĉiuj int. rilatoj. I. GODEK.

Stumblo v. ritmo.

Sturmer K. R. C., anglo, denta teknikisto. Nask. 16 apr. 1903 en Poole. Kvara infano de kulturburgaĝ gepatroj, loĝas de 1917 en Londono. Varbiĝis al E en 1922 per parolado de s-ino Blaise. Eklaboris por E en Sudlondona E Klubo, de 1925 por LE Klubo, kies vicprez. li estis en 1927. Konsilanto de BEA de 1928. De 1929 vicĉefred. de »Int. Language« kaj ĉefred. de 1930. Kunaranĝanto de UK en Oxford, 1930. Ano de BLEA de 1932 Li faris multon por seriozigi ni-

an kritikadon per sentimaj recenzoj la pikeme titolita novelo, »Por Recenzo« (1930), kaj liaj dise aperintaj noveletoj estas esence psikologiaj. En ili la agado estas ekstreme simpla. La kvietaj gestoj kaj paroloj de la figuroj valoras nur kiel signoj pri eventoj, kiuj okazas anime. Surface ilia societa vivo aspektas konvencie korekta, sed sube regas sentkonflikto, amo, jaluzo, envio kaj izoliga diverseco: sub civilizita glacitavolo la akvoj kirliĝas senripoze. Per Sturmer la influo de modernaj romanistoj anglaj kaj francaj atingis nian literaturon. Skizoj kaj noveletoj estas la literatura formo plej taŭga al lia talento, ĉar lia vivkoncepto estas kalejdoskop, ne kinofilma, kaj ĉar pli kontinua sintezo trostreĉus lian teknican paciencon. Tiun opinion cetere li pravigis ankaŭ per la publikigo de sia Notlibro (1934).

W. B. JOHNSON.

Stuttgart. Urbo en Germanujo, ĉefurbo de Würtemberg kun 375.000 loĝantoj. 12-a kongreso de SAT, 6—11 aŭg. 1932 kun ĉ. 245 partoprenantoj el 12 landoj. Malaprobato pri propono fari el SAT iun Internacion. Ŝanĝo de statuo tiel, ke LEA-oj havu reprezentanton en la ĝenerala konsilantaro.

BRUIN.

Styler (stajler) Albert Edward, anglo, instruisto de lingvoj. Nask. 28 dec. 1865 en Feckenham, mortis 25 jun. 1928 en Eastbourne. Aŭskultis prelegon de Mudie 31 okt. 1913 kaj du monatojn poste eldonis originalan skizaron: En la Montoj. En 1914 aperis En la Dolomitoj (plejparte poemoj), kaj bona traduko de In Memoriam (Tennyson).

Subjunktivo. Ĝi estas identa kun la ordona modo. Oni uzas ĝin ĉiam kun la konjunkcio KE, en kazoj, kiam la ĉefpropozicio esprimas celadon aŭ neceladon, helpon aŭ malhelpon, devigon aŭ malpermeson por io (deziri, voli, pretendi, peti, postuli, proponi, ordoni, instigi, helpi, lasi, konsenti, permesi, konsili, necesi, bezoni ktp. kaj ĉies ĉi malol).

Car la konjunkcio »por ke« enhavas ĉiam la sencon de celado, post ĝi oni devas uzi ĉiam S-on.

Post esperi oni devas uzi futuron,

same post timi. Tamen ĉe Zamenhof oni renkontas post timi S-on kun ne: »Mi timas, ke vi ne malsukcesu«. Ĉi ĉiun frazkonstruon eble oni povus klarigi per la subkompreno de DEZIRI: »Mi time deziras, ke vi ne malsukcesu«.

Multaj diras, ke en E. ne ekzistas S; laŭ ili la ordonan modon postulas ne la verbo de l' ĉefprop-o, sed la senco de l' dependa prop-o. »Mi volas, ke vi iru« diras simple: »Mi volas, iru.« Sed ĉi tiu rezonado fiaskas ĉe la mal-verboj.

»Mi malpermesas, ke vi iru« certe ne diras: »Mi malpermesas, iru!« **Kaj vere, Sentis eĉ proponas, ke oni diru: »Mi malpermesas, ke vi iros«.** Sed tio estus tia rompo de la vivanta tradicio de l' lingvo, ke ŝajnas nepre preferinde rekoni la ekziston de l' S. Tamen aliflanke, por ne erarigi pri tio, ke la S en E estus uzata same larĝe kiel en aliaj lingvoj, pli bone estas ne uzi en E la nomon S, sed nomi ĝin volitivo aŭ efikeca modo. KALOCSAY.

Noto de M. C. Butler. Kelkaj diras, ke ĉar -u montras deziron, oni ne rajtas diri: »Mi malpermesas, ke vi -u.« Tamen mi mem preferus uzi tion, ol »... ke vi iros.« Ĉu oni nepre devas diri: »Mi malpermesas vian iron« (kiel diras Bailey)?

Sub la neĝo. De J. Porchat, taglibro de juna loĝanto de la Jura montaro, el la franca trad. J. Borel, 1908, 144 p., dua eld. 1923. »Modela stilo, verketo tre uzata kiel unua legajo.« (BIL, p: 361.)

Sudafriko: Kaplando, Transvalo, ktp. La unuaj pioniroj en K. estis W. Way kaj H. Clark. En 1908 en Wellington estas fondita. EG. Pioniro en T. estis W. Coquelin (1901) kaj A. F. Whiteside (1905) en Johannesburg kaj H. Carter en Pre'oria, fondinta tie en 1906 la unuan EG. La centro de la movado estas Pretoria, kie fondiĝis ES. en 1908. Dum 1926 tie okazis 12 E kursoj, gvidataj de James kaj S-ino R. Spero. Laŭ la Dietterle-statistiko en 1928 en K. troviĝis E-istoj en 4 lokoj kaj en T. en 7 lokoj. UEA-del. en 1933 en Beaufort West, Cape Town, East London kaj Johannesburg.

I. SIRJAEV.

Sudano, Afriko. Ankoraŭ en 1897 en Segu estis E-isto Ch. de Troismonts. Dum pluraj jaroj faris prop-on A. Depuis en Tomouctou kaj Avid, radiotelegrafisto kaj UEA-del. en Bamako. Laŭ la Dietterle-statistiko en 1928 E-istoj troviĝis en 1 loko. Laŭ la ICK-raporto en 1930 »S-ro Marin ankaŭ en tiu ĉi lando povis kunigi dekon da indiĝenaj adeptoj. Li sukcesis fari paroladon en la Gordon-Kolegio en Hartum.« »Izolaj E-istoj nun estas en diversaj lokoj. En Atbara starigis grupo konsistanta el araboj, sirianoj kaj koptoj.« (1933.)

I. ŠIRJAEV.

Sufiksoj neoficialaj. El la diversaj sufiksoj aplikitaj en la teknika lingvo tri havas ŝancojn eniri la komunan lingvon: oza, signifanta materian multhavecon por anstataŭi la pezajn plena, -riĉa; iva, signifanta kapablon, do estanta la aktiva paralelo de l' pasiva e b a a (voliva: volkapabla; elvokiva: elvokkapabla); izi, en la Veraxa senco: apiki ion al io science aŭ metie, apliki metodon de elrovento (ŝtonizi vojon, salizi koloidsolvajon, pasteŭrizi lakton, faradizi nervon). Krome tre ofte oni renkontas e n d a (farenda: kion oni devas fari). Pli kaj pli ĝeneraliga la sufikso -io por landnomoj (Germanio) kaj sciencoj (anatomio-anatomio). KALOCSAY.

Noto de M. C. Butler. Mi ne kredas, ke -i- estas sufikso. Kaj certe »anatomio« deriviĝas de »anatomio« (-iisto, mallongigo -o) kaj ne inverse. Valorus aldoni kelkajn teknikajn sufiksojn -it, hiper-, k. c., pri medicino, botaniko, hemio, k. s.

Supera Kurso de Esperanto. de Dreher, 1925, 68 p. Bona kaj lerte aranĝita lernilo kun interesaj legajoj.

Supereco de E super la naciaj lingvoj. Kun nur 2635 radikoj (uzataj en la Fundamento de E) estis eble al d-ro Z starigi riĉan materialon por sia vortaro, kiu tradukas pli da ideoj, ol enhavas la nacilingvaj vortaroj mem; kaj dum en ĉiuj naturaj lingvoj, precipe la novlatinaj, estas neeble dispartigi la vortojn en apartajn lingverojn, en la lingvo E la dismembrigo de ĉiu vorto en memstarajn elementojn fariĝas ebla. Tiu ĉi ebleco devenas de tio, ke la nombro de la

radikoj, unusignifaj gramatikaj signoj kaj afiksoj estas limigita kaj esprimas ideojn precize difinitajn. (Estas vere, ke en la nuna momento la oficiala Akademia vortaro de Esperanto entenas 4184 radikojn. Laŭ Petro Stojan E havas pli ol 10.000 elementojn, kiujn oni povas klasigi jene: Finajoj 12. — Afiksoj 53. — Rilataj vortoj 205. — Radikoj 10.000, dum la Enciklopedia vortaro de Eugen Wüster entenas ĉirkaŭe 18.000 radikojn kaj 45.000 derivaĵojn.)

Ĉe tia lingvo kompreneble oni ne bezonas paroli pri devenigo de vortoj, sed nur pri vortfarado, ĉar la nombro de la elementoj estas limigata al tia minimumo, kiun posedas E.

Efektive tiuj elementoj enhavas ne nur la gramatikon kaj la sintakson, sed ili igas tute superfluaĵ la mil regulojn kun sennombraj esceptoj kaj la specialan sintakson, kiun oni bezonas en la naturaj lingvoj.

STAMATIADIS, Nova gram. libro.

Sur Sanga Tero. Romano originale de J. Baghy. 1935, 240 p. Daŭrigo de la »Viktimoj«. Kruele reala prezento de la teruraj jaroj en 1918—20 en Siberio, traplektita per personaj travivaĵoj kaj memoroj.

Sussmuth (susmut) John Joseph, usonano, ing., fabrikisto de teksaĵoj, inventisto de teksindustriaj maŝinoj, aŭtoro de teknikaj libroj. Nask. 13 marto 1883 en Oberaltstadt, tiam en Aŭstrujo, nun en Ĉeĥoslovakujo. Legas facile dekludon da lingvoj. E-isto de 1899. (N-ro 5191 laŭ Z A). En 1900 fondis la klubon »Unulingveco« en Södertälje, Svedujo, kiu poste fariĝis la Societo Int. de E-istoj, antaŭiranto de UEA. Faris prop. vojaĝon por SIDE tra Germanujo kaj al Moravujo, kie li helpis starigi la gazeton »Revuo Int.« En 1902—05 instruis klasojn en Budapeŝto, Hungarujo, estis sekr. de la loka grupo kaj kunfondinto de la gazeto »La Verda Standardo«, kies eldonanto kaj red., A. Marich estis lia lernanto. Fariĝis L. K. en 1905. De 1907 loĝas en Usono. En 1921 estis kunfondinto de la »Dol. 100.000,00 E Service Corporation«, kun oficejo je 500 Fifth Ave, New York. En 1922 fondis la »Hudson County E Society«,

estis ĝia prez. por multaj jaroj kaj en 1923 aranĝis EANA kongreson en Union City. Vicprez. de EANA, 1921—23, sekr. de 1929. Verkis lernolibrojn en sveda kaj angla lingvoj, multegaj artikoloj pri E en diverslingvaj gazetoj. Kunlaboris por multaj E gazetoj. Red. de »Amerika E-isto«. Red. de la Almanako de EANA de 1930.

Sutherland (suth'erland) George Arthur, skoto, fizikisto. Nask. 6 febr. 1891 en New Deer. Estro de kolegio Dalton Hall, en Manchester kaj speciala prelegisto en Universitato de M. Specialaĵo: akustiko de aŭdejoj. Iniciatis diversajn E grupojn. Prelegis pri mondlingva ideo kaj la sukceso de E.

Suzuki Masao, japano, d-ro med., vicprof. de fiziologio en Med. Fakultato de Tiba. Nask. 8 sept. 1899 en Nagoya. Fondis en 1924 »Eskulapidan Klubon« E-istan en Med. Fak. de Imp. Univ. de Tokyo. Ĉeestis 23-an kaj 24-an UK-jn. Inspektoro de JEI. Kun aliaj trad. en E: Hayashi kaj Tamura, »Farmakologia Praktiko por Studentoj«, 1925. Verkis: »Pri hemia terminaro«, (J), en »La Revuo Orienta«, apr. 1926.

Svanbom, K. Otto, svedo, paroĥa pastro, preposto en Söderfors. Nask. 13 febr. 1870 en Malarp. Unu el la pioniroj de E en Svedujo, kunfondinto de Klubo E-ista en Upsala, 1891 Fervore propagandis dum la unua periodo kaj daŭre per paroladoj, kursoj kaj verkado por la E-aj gazetoj.

Svantesson Oskar Vilhelm, svedo, popollerneja instruisto. Nask. 2 jun. 1904 en Tadene. E-isto de 1921. Kas. de S. Instruista EF, iniciatinto de S-E Gazetara Informo-Servo. Kursoj.

Sveda Antologio. Redaktis Sam Jansson, Bjarne Backman kaj Arne Lenner. 1934, 228 p. Tiu ĉi jam aperinta I-a parto reprezentas la epokon inter 1880 kaj 1910, la aperonta II-a parto la postmilitan epokon. La elekto speciale favoris al la verkoj, en kiu estas io speciale sveda... Jam aperintaj verkoj ne troviĝas en la antologio, kaj ofte tradukitaj verkistoj ricevis malpli multan lokon. (Laŭ »Lingvo Libro«, 1934, p.35.)

Svedujo. Unu el la landoj, kie la

»forta voko« de d-ro Esperanto plej frue redonis eĥon kaj kie lia »nova sento« trovis daŭran revibradon.

En 1889 aperis en Varsovio la unua lernolibro de Z, tradukita por svedoj de G. Henriclundquist, juna studento el Ystad, kun vortareto E-S de tiu sama. Jam antaŭe la lernolibro germana, eldonita en Nürnberg, varbis kelkajn svedojn, inter ili (31. III. 1889) teologian studenton ĉe la universitato en Upsala, A. F. Runstedt, kiu eldonis en 1890 lernilon en formo de flugfolio. Alia teologia studento en Upsala, S. A. Lundström, varbita en 1890, fondis en okt. 1891 la unuan societon: Klubo E-ista en Upsala, kiu estis dum kelkaj jaroj vera centro **tutmonda de la juna E-movado**. Ĝia dua prez., studento Valdemar Langlet, pioniro kiel turisto en E-ujo, vizitis en la somero de 1895 siajn korespondantojn en Rusujo kaj aliaj landoj. Dum lia vizito ĉe Vladimir Gernet en Odessa, la du junuloj decidis, pro la ĉeso de la »Esperant-isto«, kune fondi novan gazeton nome Lingvo Internacia (LI), kiu komencis aperi en dec. 1895 en Upsala. Sub la direktorado de Gernet prizorgis en Upsala la redaktadon kaj administradon Langlet kaj Paul Nylén, K. I. Holm kaj Alfred Sandborg k. a. Inter la pioniroj oni ankaŭ nomu O. Zeidlitz, Otto Svanbom, S. E. Krikortz kaj krom ili B. G. Jonsson en la nordo, G. H. Backman en la sudo de la lando.

En 1897, kaŭze de la dekjara ekzisto de E, la E-istoj laŭ iniciato de Gernet fondis per mondonacoj la »Kapitalon de d-ro Z« por eldonado de lernolibroj kaj vortaroj en diversaj lingvoj. Per voĉdono oni decidis transdoni al la societo »Espero« en Peterburgo la administradon kaj tiu societo komisiis al Nylén en Upsala prizorgi la presadon (de angla lernolibro kaj prop. broŝuroj ktp.). En Upsala estis presata ankaŭ »Jarlibro E-ista 1897«, eldono de Societo Espero en Peterburgo.

En aprilo 1898 fondiĝis Klubo E-ista en Stokholmo, kies sekr. estis P. Ahlberg ĝis la Ido-skismo en 1909. En 1906 Sveda E-ista Societo estis fondata en Stokholmo de repre-

zentantoj de la kluboj en Stockholm, Upsala, Falun, Eskilstuna, Karlshamn, Södertälje, Malmö kaj izolaj E-istoj el diversaj partoj de la lando (de 1 jan. 1910 nomata »Sveda E-Federacio« SEF). Unua estraro: prez. red. V. Langlet, sekr. policisto P. Ahlberg, vicprez. d-ro S. Krikortz, kas inĝ. Engelbrekt Olson. Gazeta organo »Esperantisten«.

En la vintra sezono 1905—06 la estro de la Sendependa Loĝiaro de Bontemplanoj (IOGT), parlamentano Edvard Wavrinsky, partoprenis kurson de Nylén kaj decidis fari E-n la oficiala lingvo int. de tiu ordeno. La uzo de sekretaj signalvortoj en E ĉe la bontemplanoj kaŭzis lernemon pri tiu lingvo. Speciale en Gevle tio donis impulson al la kursoj de J. Helsing, kiu fondis 8 marto 1907 la klubon E-istan de Gevle, prez. J. Norrman, aliaj pioniroj A. K. Örn, W. Wahlund, Frans Olsson, R. Pehrsson, G. Hedström, A. Liljemark k. a. Tiu grupo vigle agadis kaj konstante kreskis. De 1911 la ekspedejo kaj de 1913 la komitato de SEF funkciis en Gevle ĝis 1922. En febr. 1913 R. Pehrsson kaj W. Wahlund tie fondis la gazeton La Espero.

La movado normale kreskis en la tuta lando, speciale post la unuaj du tri universalaj kongresoj, pri kiuj la gazetaro favore kaj serioze raportis. En 1908 funkciis 28 pli-malpli fortaj kluboj. Printempe 1909 la Ido-skismo diskrevigis la organizon, Ahlberg fariĝis fanatika malamiko de E, same la gazeto, kiun li redaktis. En julio 1909 SEF tamen estas reorganizita; estraro: prez. gimn. prof. Albin Zachrisson en Karlstad, vicprez. P. Nylén, sekr. F. Skog, kas. komercisto G. Rosén (en Stockholm) ktp. Prez. de julio 1913 fervoja oficisto John Lundgren en Hedemora ĝis aŭg. 1918, kiam prez. fariĝis red. Paul Nylén en Stockholm. 1921 G. Hedström en Gevle estas elektita prez. kaj Nylén »honora prez.«; de majo 1923 oni reelektis lin kiel funkciantan prez. SEF ĉiujare kunvenas kutime dum pentekosto aŭ en Stockholm aŭ en aliaj urboj.

En 1931 SEF solenis sian 25-jaran jubileon, i. a. per eldono de luksa

Jubilea Matrikulo kun la historio de la movado en Svedujo. Estraro en 1931: prez. Nylén, vicprez. Sam Jansson, sekr. E. Malmgren, kas. Ad. Larson, bibl. Bernh. Eriksson. Stato: 62 grupoj, 1700 anoj.

La idista movado tre forte ĝenis kaj malutilis dum kelkaj jaroj la E-ismoj. La gazetaro tute rifuzis ion enpresri pri E, ĉar tuj la idistoj polemikis. Jam en 1916 la idismo montris signojn de malprogreso, kiu post 1927 estas katastrofa; restas ankoraŭ kelkaj »generalaj sen armeo« kaj ili senstrupule uzas ĉiujn ebajn okazojn por malutili al E. La morto de Z en 1917 kaŭzis artikolojn pri E en ĉiuj gazetoj kaj donis okazon por vigla propagando.

De 1918 la E-movado rimarkeble plifortiĝis. En aŭg. 1918 okazis en Gotenburgo Unua Skandinava kongreso de E, kiu estis neatendite favore raportata en la gazetaro. Enskribiĝis por ĝi 189 personoj, svedoj, danoj kaj norvegoj; pro la kriza tempo povis partopreni nur la duona nombro. Tie la SEF decidis fondon de »Eldona Societo Esperanto«.

Monkolektado en 1921—22 donis sumon da 1.138 kr. kaj 1925 estas fondita Propaganda kaso de SEF, en 1931 posedanta la sumon da 4.100 kr., kies nur rentumo estas elspezata.

Gazeta organo de la sveda movado estis unue »LI« 1896—1905, »E-isten« 1906—08, »Dana E-isto« 1909, »Sveda E-isto« 1910, (»E-Folket« 1911, 1912). De 1913 »La Espero«, nomata de 1925 »Svenska E-Tidningen — La Espero«. De la fino de 1927, kiam B. Eriksson translokis el Ludvika sian presejon en Stokholmon, li prizorgas la gazeton en sia E-presejo kaj estas ankaŭ ĝia redaktoro.

Por instruado kaj ekzamenoj SEF fondis (16. IV. 1922) ekzamenan komisionon »Sveda E-Instituto«, kiu reorganizis en 1929 la decidoj de SEF kaj de Sveda Instruista E Fed. kaj de Sveda Laborista E-Asocio (SLEA); ili elektis po du reprezentantojn kiel estraron. Tiu elektis la Instituton direkcion, nome: rektoro Sam Jansson, membroj G. Ahlstrand, E. Malmgren, P. Nylén kaj C. Ohlsson. Anstataŭ A. la estraro elektis en jan.

1932 John Johansson, anstataŭ O. Ohlsson 1934 Karl Söderberg.

Aperis en Svedujo 27 lernolibroj en 44 eldonoj da ĉirkaŭ 170.000 e-roj, krom tio la ŝlosilo en 140.000 e-roj kaj vortaroj en 13 eldonoj da 55.000 e-roj ĝis fino 1932.

En 1925 SEF aranĝis elementan perkorespondan kurson en 6 lecionoj kun demandfolioj, kiujn korektadis helpemaj samideanoj (V. Bonde en Falun, Ebba Anderson en Helsingborg, A. O. Ehlin en Sala, k. a.). En 1929 oni decidis aldoni al la kurso, ĝis tiam senpaga, ŝlosilon kaj du aliajn libretojn, kaj ekpiedi la kurson al ĉiu, kiu ensendis la prezon 1 kr. Ĝis komence de aprilo 1933 tiun kurson mendis pli ol 27.000 personoj. Ĝi estas unu el la plej efikaj varbiloj kaj kreis multajn bonajn E-istojn. Perfekta koresponda kurso de SEF en ses leteroj-lecionoj, prezo. 5 kr., estas verkita 1926 de rektoro Jansson, kiu ĝin prizorgas. Pli ol 1.000 personoj mendis ĝin antaŭ 1933.

Kursoj de fremdlandaj instruistoj multe helpis la propagandon. Vokita de SEF pastro Andreo Cseh komencis aŭtune de 1927 paroladan vojaĝon en Svedujo kaj komence de 1928 kursojn en Stokholmo kaj aliaj urboj ĝis la somero 1929. Peton pri forpermeso de Cseh de lia episkopo subskribis princo Carl, frato de la reĝo kaj urbestro Lindhagen. Multaj personoj partoprenis tiujn kursojn, kiuj kvankam tro rapidedaŭraj por krei verajn E-istojn, tre favorigis la publikon kaj eĉ aŭtoritatulojn por E. Aliaj fremdaj instruistoj, Cseh-metodaj, aŭ ne, same agadis: Tiberio Morariu, Elinjo Pähn, Henrik Seppik, T. Czitroni, Hans Fox, Hans Hurler, Albert Rois, Neeme Ruus, d-ro Fr. Szilágyi, Lidja Zamenhof, Erland Weber k. a., entute pli ol 15 fremduloj. Post 1933 ankaŭ aliaj fremduloj instruis en Svedujo.

De 1922 E pli kaj pli eniĝis ĉe la studrondoj de la grava »ABF« (Laborista Kleriga Asocio), kie en 1930—31 partoprenis en 246 studrondoj de E 3.632 personoj, en 1931—32 en 432 studrondoj ĉ. 6.030 personoj. En la bontemplana asocio IOGT samtempe 61 studrondoj.

En 1929—30 la hindio L. Sinha faris dum prelegvojaĝo (aranĝita de E. Malmgren) tra Svedujo pli ol 10.000 km. 200 prelegojn antaŭ ĉ. 30.000 personoj, ĉie interpretata de lokaj E-istoj.

La granda plifortiĝo de la sveda E-movado en la periodo 1925—33 dependas de multaj faktoroj. Dum tiu tempo la movado sukcesis havigi al si multajn energiajn E-istojn, kiuj malavare dediĉis tempon kaj kapablon al la laboro. Dank' al tio oni povis pere de neniu aj tre malgrandaj monrimedoj pli malpli favorigi la ĝeneralan opinion de la granda publiko. Tion montras plej bone la gazetaro. En la periodo 1889—1909 oni do povas rimarki konstantan kreskon de la intereso por E. Sed venis la Hluskismo, kaj la E-movado tre suferis. Oni devis komenci la laboron preskaŭ denove. En la tempo 1910—25 la evoluo de la movado bataladis kontraŭ sufiĉe forta indiferenteco de la granda publiko. Tre malrapide la movado antaŭeniris. Sed post 1925 oni povas konstati konsiderindan ŝanĝon. Nur je tiu tempo la publiko ŝajne forgesis la akrajn konfuzigajn batalojn inter E-istoj kaj idistoj, kaj nur tiam oni komencis kompreni la fakton, ke E estas la sola helplingvo uzata en la praktiko. Tamen granda publiko ankoraŭ tre skeptike rigardis la E movadon. Dum la unuaj jaroj de la lasta periodo de 1925 ĝis en 1929 la gazetoj pli kaj pli volonte enprenis novaĵojn pri E, tamen ofte tre ironie kaj ŝerce. Sed de jaro al jaro la tono de la artikoloj ŝanĝiĝis. Kaj nun, komence de 1933, la plej grandaj ĉiutagaj gazetoj de Stokholm kaj de aliaj urboj pliofte aperigas artikolojn pri E en objektiva maniero. Multaj gazetoj aperigas konstantan E-parton. Plej longe tion faris la fervojista gazeto »Signalen« sub lerta gvidado de parlamentano Ernst Eriksson. Multaj ĉiutagaj ĵurnaloj aperigis kursojn kaj komence de 1933 ankaŭ la tutlanda pacifista ligo konsentis pri E-kurso en sia gazeto »Freden«. Komence de aprilo 1933 la interskandinava hotel-pordista gazeto ankaŭ komencis E-kurson.

Sur la vojo al tiu stato ni memor-

igu pri kelkaj gravaj faktoj: grandegaj E-kursoj en la tuta lando de fremdlandaj instruistoj, specialaj instruistkursoj, grandaj per E-aj turistvojaĝoj, la apero de la gravaj libroj »Per balono al la poluso« (= la André-libro) kaj »Tra sovaĝa Kamčatko«, la malmultekosta koresponda kurso de SEF, la prelegvojaĝoj de la hindo Sinha, ankaŭ de la amerikano Scherer kaj de la aŭstro Steiner, oftaj gazetaj intervjuoj kun fremdlandaj E-istoj pro iliaj vizitoj al Svedlando ktp.

Sed tiuj grandskale planitaj kaj efektivitaj per- kaj por-E-aj agoj ĉiam devis sin bazi sur la intereso por E, kiun kreis la lokaj Esperanto-kluboj aŭ izolaj E-istoj. Svedlando havis kaj havas la favoron posedi grandan stabon da personoj, kiuj helpas la movadon. Ni menciuj kelkajn lokojn kaj iliajn gvidantojn:

En **Bengtsfors**: la ĉiam agema, fidela veterano C. Winberg postenis kun la verda standardo; en **Blädinge**: F. Johansson; en **Borlänge**: A. Vadfors instruis en sia lernejo, M. Jansson fervora apostolo, f-ino E. Bodén en la EI; en **Boras**: O. Roesel fidela apoganto, G. Carlander instruanto-apoganto; **Ekshäråd**: N. Anderwall, kiu krome multe propagandis inter la sveda pacifistaro; **Enköping**: ges-roj E. Holmström (nun en Västerås); en **Eskestuna**: fidele propagandis A. Agren kaj E. Johansson; en **Fagerssta**: lerte gvidas S. Ceder; **Falun**: V. Bonde kaj G. Johansson lingve lertaj, E. Ström organizanto; **Gevle**: veteranoj A. Liljemark kaj A. K. Örn, kaj novaj propagandistoj Hedbom, G. Aström, G. Ahlstrand. Tiu laste nomita gvidis la porinstruistajn kursojn en 1930 kaj 1931 en Stockholm kaj estis dum la nomitaj jaroj membro de la direkcio por SEI, en 1931 sekretario-sindikato de SEF. W. Wahlund en kriza tempo malavare monhelpis al la propagando.

En **Göteborg**: E. Adamson, E. Ekström, T. Torbjär, O. Svantesson. Li ekde 1932 sekr. de Sveda Instruista EF, organizis en 1931 SEGIS, kiu liveras E-ajn novaĵojn al la sveda gazetaro. T. Torbjär lerte organizis E-

kursojn kaj fariĝis 1932 prez. de Sveda Instruista EF; li estas peranto de Int. Ped. Revuo. **Hällevik**: H. Ysner; **Helsingborg**: s-ino Ebba Persson nask. Andersson, fidela lernantino de Backman, G. Henriks-son, agema pri radio kaj turismo; **Härnösand**: gimna tiktirektoro E. Blomberg; **Höganäs** Albin Johansson; **Höör**: Nils Olsson; **Insjön**: Ivar E. Karlsson lerta prez.; **Jämsjöslätt**: kursgvidanto E. Österlind; **Jönköping** jurnalistoj Knut Jensie kaj Ernst Juneby, veterano F. Skog; **Katrineholm**: B. Ortengren; **Kil**: H. Nordling **Kiruna**: G. Otterfors kaj G. M. Bengtsson. La laste nomita kun verve kaj lerteco gvidis la E-movadon en **Lapplando**, aranĝis la grandajn kursojn de la eksterlandaj instruistoj Seppik kaj Ruus kaj entute estis la firma E-roko en Lapplando. **Kristianstad**: Nils Nordlund verkis multajn E-lernolibrojn; **Kristianhamn**: Hjartstätt eldonis diversajn lernilojn. **Landsbro**: Helmer Engstrand; **Linköping**: f-ino Anna Gyllsdorf; **Ljugarn**: U. Hultin, A. Malmkvist; **Ludvika**: F. Johansson instruas; **Luleå**: pioniris J. A. Brogren. En **Lund**: J. Ek kaj Olle Olsson faris miraklojn. En **Malmö** fidele laboras Otto A. Nilsson kaj la pioniro Erik Andersson; Harry Nilsson gvidas pri turismo. **Munkedal**: J. A. Hansson. En **Norrköping**: lerte agadas Josef Pihlström, Sven Ragnar, O. Göransson, P. Skarp kaj f-ino Eva Tibbling. **Nyberget**: Stellan Engholm konata E-verkisto kaj lia edzino. En **Rödeby** instruisto Fritiof Ahnfelt senlaca E pioniro de la provinco Blekinge. En **Stockholm** sin prezentis en la lastaj tempoj multaj novaj prop-istoj, se ni nomas ekz. Bernhard Eriksson, H. Nordkvist, Birger Gerdman, Sven Bohlin, Sam Owen Jansson, Sigv. Håkansson, Thedor Julin, H. Halldor, A. Larson, Hjalmar Lindstedt, Bengt Skantz, E. Malmkvist, N. Hedgren, Rudolf Pehrsson Carl Ohlsson, s-ino Eva Julin kaj f-ino Alfhild Svedmark, restas tamen multaj por nomi. Eksurbestro Carl Lindhagen faris laŭdindan laboron en

la Parlamento. Sundsvall: C. W. Sjögren, Edvin Björkstrand kaj A. Hellbom. Svennevad: la instruisto Linus Andrén. Södertälje: Erik Grahn, Herman Leijon, instruistino Hanna Eriksson. Sölvesborg: f-ino Ella Nilson. Uddevalla: Einar Dahl. Uppsala: Frits Lindén, Gösta Norling, Ernst Brink, Karl Söderberg kaj prof. de finno-ugraj lingvoj Björn Collinder, unu el la plej lertaj lingvistoj nuntempaj, krome A. Palm. Visby: K. G. Andersson. Vingaker: instruisto Hjalmar Kihlberg. Västerвик: Ernst Nordgren kaj proksime, en Ankarsrum H. Nanning. Västerås: O. Dahné. Ystad: Harald Skog (kiu verkis prop-aĵon, i. a. la unuan broŝuron kontraŭ Ido), Algot Jönsson. Örebro: f-ino Ruth Hallgen, Bernhard Lavén, Olle Persson, Sigurd Ekendahl kaj Erik Karlén. Krom la nomitaj ĉie tra la tuta lando multaj, multaj aliaj.

Dum 5 lernjaroj, 1922—27, E estis studobjekto en la 5-a klaso de la »Beskova lernejo«, mezlernejo kaj liceo en Stokholmo, posedata de kompanio kun ŝtata subvencio, Rektoro Sam Jansson instruis, finante ĉiun lernjaron per speciala ekzameno. Inter la lernantoj sin trovis princo Carl, hereda princo de Svedujo, duko de Östergötland. Nova lerneja leĝo malfaciligis daŭron de tiu E-instruado.

»Hermods Korrespondens-Institut« en Malmö konstante instruas E-n per 14. kajera kurso, tre anoncata tra la lando.

Post propono farita de E. Malmgren la Stokholma lerneja inspektoro Karl Nordlund laŭ rekomendo de la instrukomitato de lerneja direkcio permesis E-instruadon en Stokholma lernejo, Mälarhöjden, dum la lernjaroj 1928—29 kaj 1930—31. En tiu lernejo okazis la unuaj devigaj E-kursoj en Svedlando. La kursoj okazis en la 8-a klaso (15-jaraj infanoj) kaj anstataŭigis la instruadon pri la angla aŭ germana lingvoj. Okazis 4-hora instruado semajne dum 39 semajnoj. Ambaŭ kursoj finiĝis per t. n. lerneja vojaĝo al Estonujo, kie la lernantoj ĝuis la restadon en la

kadro de E-parolantaj estonaj ge-
knaboj.

Nedeviga E-instruado okazis en multaj aliaj lernejoj kaŭze de la granda intereso de la sveda instruistaro. Laŭ farita statistiko en la dekjara periodo 1922—1932 lernis E-n ĉ. 2.000 geinstruistoj svedaj. Tiu evidente granda intereso por Esperanto multe dependas de la svedaj instr. gazetoj, speciale de »Folksko Lärarnas Tidning« (La gazeto de la popolinstruistoj) kaj de »Lärarinneförbundet« (Unuiĝo de instruistinoj), kies redaktoroj s-ro John Forsell kaj f-ino Gerda Nystedt tre simpatie rilatis al E. Same la parlamentano Ruben Wagnsson, kiu estas redaktoro de »Svensk Lärartidning« (Sveda instr. gazeto).

Komencinte de la aŭtuno 1930 la »ABF« disponigas al SEI en la Radio-programo tutsveda duonhoron en unu dimanĉomatenato de ĉiu monato.

Rimarkinda afero estas Radio-diskuto pri la »mondlingva problem«, kiun aranĝis radio-servo de Svedujo 30. 3. 1933. ne sole E, sed ankaŭ Ido, Occidental, Novial kaj Anglie estis reprezentataj samnivele per prelegoj kaj diskutaj paroloj, kio donis al la nescianta publiko konfuzan imagon de la situacio. Krom tio s-ro Zachrisson, prof. de angla lingvo ĉe la Univ. de Upsala, aŭtoro de »Anglic« (ortografia sistemo de la angla lingvo), uzis la okazon por skandali E-n, kiu, laŭ li, ne estas parolebla kaj estas tre danĝera afero. Por E parolis la lerta lingvisto d-ro Björn Collinder, prof. de finno-ugraj lingvoj ĉe la Univ. de Upsala, kaj ankaŭ fil. mag. K. Söderberg kaj rektoro Sam Jansson. La afero tamen utilis por vekti intereson en la granda publiko tra la lando.

Post tiu radio-diskuto (iniciitata malgraŭ rifuzo de la E-istoj) la Stokholma grupo per sia energia vicprez. T. Julin aranĝis en la centro de la ĉefurbo ekspozicion por montri al la publiko, ke E. estas lingvo preta, uzata kaj utila; i. a. la kronprinco de Svedujo vizitis kaj interese rigardis la ekspozicion.

P. NYLEN kaj E. MALMGREN. Laborista movado. La komenco datas de 1905, kiam fondiĝis

anarkiista E-klubo (certe la unua pure lab. EK en la mondo). En 1907 estis loĝio de la abstinenca ordeno Verdandi (socialisttendenca), kies pritraktoj okazis en E. En 1912 fondiĝis iniciate de red. John Johansson lab. klubo de Stokholmo, kiu tre vigle laboris en la unuaj jaroj, sed dum la milito iom post iom malvigliĝis kaj fine en 1919 mortis. En 1921 estis fondata laŭ iniciato de red. Einar Adamson Sveda Laborista E-Asocio — SLEA — (svede: Svenska Arbetar-Esperanto-Förbundet). Sidejo: Gotenburgo. Komence la asocio havis nur 20 anojn, sed per la gazeto: »Svenska Arbetar E-isten« ĝi baldaŭ havis pli multajn anojn kaj post dujara laboro la asocio kalkulis 200 anojn, atingis fine de 1928 1,100 anojn. Laŭ decido de la asocia kongreso en Stokholmo 1931 la asocio translokiĝis en la svedan ĉefurbon, kie ĝi ankoraŭ havas sian sidon. Prez.: unue Adamson, de 1931 parlamentano Ernst Eriksson. Per la translokiĝo estiĝis pli favoraj laborcirkonstancoj por la asocio. Trovante sin en la centro de la lab. movado de S., ĝi havas pli grandajn eblojn agiti inter la sveda laboristaro, ol ĝi havis pli frue. Dum la lastaj tri jaroj de la gotenburga tempo la anaro mal-kreskis, sed de la lokiĝo en la ĉefurbon la asocio denove kreskis kaj 1 marto 1933 ĝi havis pli ol 1,400 anojn, enregistritajn en sepdeko da lokoj kaj sesdeko da kluboj. Eldonkvanto de la gazeto, kies redaktoro de 1931 estas John Johansson, atingas la nombron da 2,500. La asocio eldonas ĉiusemre specialan varbgazeton svedlingvan, nomatan »Sommar«, por propagando en lab. rondoj. — Ĉar la asocio speciale laboras inter laboristaj rondoj, ĝi turnas sin al la faksindikatoj kun petoj pri morala kaj mona helpo. Laŭ la statuto tiaj organizoj ankaŭ povas esti subtenantaj anoj kaj la nombro da aliĝintoj laŭ tiu kondiĉo estis ĉe la jariĝo 1932 96 faksindikatoj, abstinencaj loĝioj ktp., kiuj pagas poĵare minime po 5 sv. kr. — kelkaj 10 ĝis 50 kr. — La asocio posedas propran eldonejon, kiu aperigis verk-ojn en E kaj sveda lingvoj. — Kune

kun SEF kaj Sveda Instr. E-Asocio SLEA fondis Svenska E-Institutet (SEI), kies tasko estas instigi kaj kontroli la scion en kaj pri E, donante pri tio diplomojn post ekzameno, fari statistikon pri la movado ktp. — En 1928 la sveda lab. socialdemokrata partio ĉe sia kongreso pere de anoj en SLEA faris favorrezolucion por E, kiu kiel senperan efikon ekhavis la enkondukon de E-aj kolonoj en la socialista gazetaro kaj ankaŭ igis la partian estraron doni monan subvencion al delegitoj ĉe kongresoj de SAT.

Kun »ABF« (Arbetarnes Bildnings-Förbund — Kleriga asocio de laboristoj) SLEA intime kunlaboras kaj dum la vintra sezono 1931—32 la nombro de ties studrondo de E estis 432; E estis la duaranga temo de ĉiuj ABF-studrondoj, kaj la nombro konstante kreskas.

J. J-n.
Sveda Instruista E-Federacio, fondita 9. VIII. 1918 en Gotenburgo de G. H. Backman kaj N. Nordlund, atingis en 1933 la nombron de 300 anoj. Agemaj en ĝi estis i. a. jenaj personoj: Sam Jansson, E. Malmgren, Algot Blid, Linus Andrén, F. Ahnfeldt, G. Ahlstrand, G. Otterfors, E. Dahl, O. Svantesson, instruistino Elsa Ozarowsky, k. a. La estraro en 1933: prez. Thorsten Torbjär, sekr. O. Rimberth, kas. O. Svantesson. Ĝi aranĝis laŭ iniciato de E. Malmgren en 1929, 1930 kaj 1931 ŝtate subvencitajn kursojn por instruistoj (la parlamento asignis po 2.900 kr. jare), 1932 kaj 1933 sen tia ŝtata subteno.

Esperanta Turista Komisiono, fondita de E. Malmgren en 1929 aranĝis turistvojaĝojn per E al la Baltaj landoj, eldonis gvidlibrojn ktp. Ekde 1932 ETK funkcias kiel estraro de E-a Turista Asocio, kiu komence de 1933 havis reprezentantojn en 50 svedaj lokoj. Estraro estas E. Malmgren, Hj. Lindstedt, G. Gustavsson. ETK aranĝis ĉiujare ekde 1929 turistvojaĝojn inter Stokholmo kaj Tallinn (ĉefurbo de Estonujo). La vojaĝoj okazis ĉiusemajne dum junio kaj julio. Partoprenis mez-nombre 20 personoj. En 1930 la direkto de la Stockholma Ekspozicio

transdonis al ETK la por-ekspozician propagandon en Estonujo kaj Latvujo. La rezulto estis neatendite bona, speciale rilate al Estonujo. Preskaŭ 1.000 estonoj — kaj el ili la plej granda parto vojaĝis en la grupvojaĝoj de ETK. — vizitis la ekspozicion, kaj la ekspozicia direkcio poste letere esprimis specialan dankon pro faritaj servoj. N. kaj M.

Sveda E-a Gazetara Informo-Servo (Segis). Iniciatita en 1931 de Oskar Svantesson, Göteborg. Ĝi celas provizi kiom eble plej multajn svedajn gazetojn per artikoloj pri E kaj ĝiaj progresoj, redakti E-kolonojn en gazetoj kaj fari statistikon pri artikoloj en la sveda gazetaro pri E. En pluraj lokoj tra la lando ĝi havas lokajn kunlaborantojn. Oficejaj kunlaborantoj estas Thorsten Torbjär, f-ino Stina Blomqvist kaj Bertil Magnelson. Plej grandaj ekonomiaj subtenantoj estas SEF, Sveda Instr. EF kaj Thorsten Torbjär. Adreso: Karl Johansgatan 61, Göteborg.

Eldona Societo-Esperanto eklaboris aktive sub la gvido de H. Halldor en 1925. De tiam ĝi eldonis 7 lernolibrojn, 7 legokaj ekzerclibrojn kaj 11 literaturajn verkojn, inter ili: Per Balono al la Norda Poluso, Gösta Berling kaj Sveda Antologio. La valoro de tiuj verkoj estas en ora valuto kalkulata 66.— svfr. El ĝiaj eldonaĵoj kelkaj gramatikoj atingis kelkdek milon. ESE estas ankaŭ unu el la plej grandaj vendistoj de fremdaj eldonaĵoj.

Sveŝnikov N., ruso, dir. de gimn. en Vjatka. Estis la unua rusa E-isto (laŭ atesto de K. Ostanieviĉ), kiu skribis leteron en E al Z.

Svislando (Schweiz, Suisse, Svizera), politike nomata Svisa Konfederacio, t. e. Schweizerische Eidgenossenschaft, Confédération Suisse, Confederazione Svizzera.

Generalaj informoj. amplekso: 41,295 kv. km. Loĝantaro: 4 milionoj, el kiuj 3,6 milionoj da svisoj kaj 400,000 fremduloj. Parolataj lingvoj: germana 2,85, franca 0,84 itala 0,24, romanĉa 0,043, aliaj 0,027 milionoj. Ŝtata organizo: federacia ŝtato de 22 interne memstaraj landoj (kantonoj). Sendependeco rekonita en la

Westfala paco 1648, daŭra neŭtraleco 1815, transformo en federacian ŝtaton en 1848. Konstitucio de 1874 (kun multaj ŝanĝoj sinsekvaj). Reprezento: Federacia kunveno (Bundesversammlung, Assemblée fédérale) kun du ĉambroj: Nacia konsilantaro kaj Konsilantaro de la ŝtatoj. Supera aŭtoritato: Federacia konsilantaro, konsistanta el sep anoj. Tiuj sep konsilantoj plenumas la oficon de ministroj. Ĉiujare estas elektata el ili la prezidanto de la konfederacio. Popolinitio: Nur por ŝanĝi la konstitucion kaj por nelimigitaj aŭ pli longdaŭraj ol 15 jaroj ŝtatkontraktoj. Nombro de iniciantoj: 50.000. Popola decido (referendumo): Laŭ iniciato de 30.000 civitanoj.

La kvarlingveco (kio ne signifas, ke ĉiu sviso parolas tiujn lingvojn) kaj la geografia situacio meze de Eŭropo okcidenta igas S-n lando de trapasado de homoj kaj varoj. Bilde prezentita kiel turniĝanta plato de Eŭropo. La strukturo de la lando, altaj montoj, malvastaj valoj, kreis homtipon tute apartan. Tio esprimiĝas jam en la ĉefa lingvo, la germana, parolata eĉ inter la kleraj homoj nur en la konata dialekto supergermana, la Schwytzerdütsch, kun nombro de interesaj malnovaj vortoj, ne plu uzataj en la altgermana. Tradiciema, liberecema, iafoje obstina, miksitita kun sobre praktika sento, jen proksimume svisaj trajtoj. Influita multe de la franclingva (romanda) parto, tiu ĉi mozaiko kompletigas per kritikemo kaj forte esprimita individualismo. Tiu ĉi lasta kvalito manifestiĝas en jaluza defendo de rajtoj, ĉu de propra landeto (kanton) ĉu de individua rajto civitana. Tion memulaj nomas kelkfoje »kantona spirito« (Kantönlisgeist).

En Svislando. Unua provo ekplati E-n en la ŝtonan teron de S. estas parolado de A. P. Dubois, dir. de Komerca Lernejo en Le Locle, 1898 (frato de la fondinto de P' plej malnova E-grupo svisa »La Stelo« en Genève, H. Dubois. Laŭ la presitaj dokumentoj estis broŝuro germanlingva, eldonita de Th. Hopt (reprezo el svisgermana gazeto en Thun), kiun oni povus nomi la ekmarŝo de

la movado. Jaro 1903. Tiam jam aperis multobligita periodaĵo »Svisa Espero« kiu informas pri la Svisa E-Societo fondita en 1902. SES estas laŭ aĝo la dua nacia societo E-ista, post la franca, la unua, fondita en 1898.

Pioniroj. La speciala karaktero de la lando ne allasis fondon de granda movado. Skeptikaj en iu grado, la svisoj ne tre facile aliĝas al modernaj movadoj kaj estas fakte nur en la kelkaj gravaj urboj, kie ekfloris tio, kion nomi esperantista vivo ni kutimas.

Gravan moralan subtenon ricevis la ideo int. lingvo kaj de E per la apogo de eminenta filozofo Ernest Naville (ĝenevano), membro de la »Institut de France«. Estis li, kiu en »Bibliothèque Universelle« (1900) verkis artikolon tre favoran pri E, kiun poste prezentis ĝeneralo Sébert al la Akademio de Sciencoj. Naville je pluraj okazoj montris sian favoron al E kaj precipe kuraĝigis pioniron de nia movado Edmond Privat gimnaziano fervorplena.

Nomoj kiuj distingigis en la movado estas du nedisigeble ligitaj: Edmond Privat kaj Hector Hodler. En la unua tempo de E en S., ni vidas aperi nomojn de E. Failletaz (unua prez. de SES), de profesoro Hug (Fribourg), de Th. Renard (Genève), en kies domo loĝis D-ro Z, de S. Feierabend (Bern). Nomo preskaŭ forgesita estas tiu de Jean Borel (Vaumarcus), kiu estas la fondinto de la E-eldonejo en Berlino (Möller & Borel) nuna firmo Ellersiek. Jean Borel verkis la plej uzitan germanlingvan gramatikon (»Vollständiges Lehrbuch.«) Aliaj pioniroj estas: René de Saussure (Genève), Jakob Schmid (Bern), Ed. Stettler (Bern), la fratroj Stroele, (el kiuj Georges Stroele estas la talenta recenzisto de »Esperanto«). En laboristaj rondoj kaj ĉefe en Zürich la nomo de Karl Jost restas kiel pioniro kaj kiel plej energia kontraŭulo de Ido. Inter instruistojn germanlingva parto de S. estas Heinrich Fridöri (Zürich).

Periodaĵoj. De 1902 aperas »Svisa Espero« kun kelkfoja interrompo. Plej ofte posedaĵo — kaj

sekve riskaĵo — privata, ĝi konis »luksan tempon« kiam René de Saussure eldonis ĝin. Sur kreta papero — kun koloraj bildoj, arte aranĝita laŭ la gusto de la tiama tempo, tiu ĉi periodaĵo konkludigis falsan situacion. Estis la tempo de oferemo — granda. Oni kredis, ke sufiĉas ioma puŝo kaj la venko estas proksima. Inter tiuj, kiuj oferis multan monon por la gazeto, ni citu Karl Jost, kiu dum jaroj eldonis ĝin kun multa monperdo. — Sed en S. aperis alia periodaĵo, kiu en sia speco estas pruvo por ekzistebleco kaj ĝia malo, de speciala revuo. Estis la »Scienca Revuo«, lerte redaktita kaj pagita de René de Saussure. Dum sep jaroj aperis tiu ĉi revuo por fine iri en la manojn de firmo Hachette. Kaj ĉesis aperi en 1914. — »Esperanto«, la organo de UEA estas ankaŭ svisa produktaĵo — se ne laŭ preseja vidpunkto — almenaŭ laŭ deveno. Fondita de Paul Berthelot, Hector Hodler akiris ĝin en 1905 kaj faris ĝin la centra organo de la praktikuloj. Ĝi estas unika periodaĵo jam pro sia migrado: presita komence en Francujo, poste en Svislando, poste en Ĉeĥoslovakujo, en Germanujo, en Belgujo, kaj fine denove en Francujo, kio pravigas la proverbon »Oni revenas ĉiam je sia unua ano.«

Presaj svisaj. La fakto, ke S. estas lingve ano de la najbaraj landoj, ne kuraĝigis la eldonistojn. Kai sekve ne estas multaj verkoj, kiuj aperis en la lando mem. Aperis lernolibroj de svisaj aŭtoroj kaj en S.: Hopf (»Anfangsgründe«), Jost (»Lehrbuch«) Perlet (»Lehrbuch«), Schmid (»Briefe«), Privat (»Manuel«). Inter svisaj verkistoj E-aj Privat estas la plej konata, (»Tra l' silento«, »Karlo«, »Kursa Legolibro«, »Genevra«, »Esprimo de sentoj«, »Historio de E«, »La Vivo de Z« (k. a.)). Se ne aperis multaj verkoj kaj rimarkindaj, tamen S. havas la honoron esti la centro por la praktika agado, el kiu fluis la ĉefa dokumento de la movado: la »Jarlibro de la E-Movado«, kiu evoluigis de simpla libreto de 24 paĝoj al diĉa volumo kelkcentpaĝa. Unika estas ŝlosilo de E en la 4-a, kutime forgesata lingvo de S., latinida idi-

omo kun etruskaj restaĵoj, parolata en Grizono.

Universala Esperanto Asocio. S., por multaj ne-svisoj idealo de intergenta kunvivado harmonia, estas denature destinita doni hejmon al la centro de la E-Movado. Tion d-ro Z mem jam antaŭvidis kaj la faktoj pravigis lin. — Fondita laŭ ideoj de ne-svisoj UEA montras tiom da tipaj trajtoj svisaj, ke oni ne povus ja paroli pri ĝi, ne pensante al la lando de la sidloko. Estas feliĉa kuniĝo de multaj faktoroj, kiuj igis la urbon Genevo centro de la movado, kiel ĝi fariĝis centro de aliaj tre gravaj movadoj internaciaj kaj fine sidejo de interŝtataj organizaĵoj, Ligo de Nacioj, Int Labora Oficejo. (Pri UEA v. apartan artikolon).

E-istoj en Svislando. La jam aluditaj ecoj de S. kaj la centrigo de la movado, kaŭzis, ke en S. vivas daŭre aŭ por certa tempo, alilandaj E-istoj. Multaj samideanoj alilandaj studis en S. kaj iuj konatiĝis kun E dum studado tie ĉi. La centrigo de la movado alvenigis konatajn E-istojn, kiuj por certa tempo aŭ daŭre restas tie ĉi, inter ili Renaud Richez, Andreo Cseh, Petro Stojan, Robert Kreuz k. a.

Kongresoj. En S. okazis tri UK-j: la 2-a en Genève, 1906, la 9-a en Bern, 1913, la lasta antaŭmilita kongreso, la 17-a en Genève, 1925. Prezidis la duan kongreson pastro Schneeberger kaj estas fiksitaj dum ĝi la kreo de la Konstanta Kongresa Komitato. Oni fondis sub la impulso de generalo Sébert la Sciencan Asocion E-istan, kiu konis poste tre belan evoluon. La naŭan kongreson prezidis konata pioniro Jakob Schmid. Ĝi estis la fino de la bataloj pri reformoj, esprimita per deklaro de fido al la Lingva Komitato. Fine la 17-an kongreson en Genève, prezidis d-ro E. Privat. Inter la serio de kongresoj la ĝeneva estis la plej bela kaj plejharmonia. Dum ĝi estas inaŭgurita la Somera Universitato, ideo de Privat.

Fremdaj E-istoj. S., turisma kaj restada teritorio altiris ankaŭ fremdajn E-istojn, ĉu por studi, ĉu por ripozi kaj restadi pli longe. Aro

inter tiuj samideanoj okupas hodiaŭ gravajn postenojn en siaj landoj kaj ĝojige estas konstati, ke ĉiuj memoras kun plezuro la tempon pasigitan en S.: Devjatnin, Evstifeieff, d-ro Ostrowski el Yalta, f-ino Sarapova el Kostroma, s-ino Umanski el Odesa, fidela animo de La Stelo en Genève: d-ro Schacht (Ĉernauti), I. H. Krestanoff, Pirdop, infanoj de d-ro Zamenhof, d-ro Emiljan Loth, Pabjanice, kaj multaj aliaj.

Skismo. La jena priskribo ne estus komleta, ne menciante ion pri la skismo kaŭzita en 1907 per la apero de Ido. En S. ĝi kalkulis aron da fervoraj, por ne diri fanatikaj defendantoj. Inter la kondukantoj ni citu pastron Schneeberger, parlamenta stenografo, eks-prezidinto de la Svisa E-Societo, la komerciston Anton Waltisbühl en Zürich, fine la idistan prototipon Albert Nötzli en Zürich. Aliaj konataj personoj, malpli inter la E-istoj sed en publika vivo estis la fratoj Wenk en Basel, el kiuj unu revenis al E per solena deklaro okaze de la naŭa kongreso en Bern. La diskutoj kaj disputoj kun la idistoj fariĝis plej akraj en Zürich kaj ĉefe inter du personoj: Nötzli kaj Karl Jost. Rerigardante, oni povas diri, ke la forblovon de la idisma danĝero oni dankas en germana S. al la persista, obstina kaj preskaŭ fanatika laboro de Karl Jost. Hodiaŭ la idisma movado iam konsiderinda pro la nomo de kelkaj favorantoj kaj timinda pro la bataforto de aliaj, estas komplete disblovita. GEORG AGRICOLA.

Sygnarski Mieczyslaw, polo, instr. Nask. 30 nov. 1889. Unu el la plej fervoraj prop-istoj de E inter instruistoj kaj en lernejoj. 117 prelegoj ekde 1920. Gvidas kursojn; de 1931 pli ol 800 lernantoj. Verkis lernolibron por gimnazianoj, de la ministerio aprobitan, trad. romanon »Kiu kulpas« de Reytan.

Szentmáryai (sentmárjai) Dezső, hungaro, ĉefapelacia juĝisto. Mortis en? Prez. de HES, 1908—11. Tre multon klopodis ĉe oficialaj faktoroj por E.

Szilágyi (siládji) Ferenc, (ps. Silabo, Silag, Sife, Fersil, F. S.), hungaro, d-ro jura, redaktoro, E-instru-

isto. Nask. 1 febr. 1895 en Budapest. Estis oficisto, longtempe senlabora. Estis ĉefsekr. de la Lit. Societo »Vajda János«. Kunlaboranto de diversaj hungaraj gazetoj. E-isto de 1924. (l. i. Heroldo, 1930, n-ro 5.) Komence li agadis en la oficista grupo de HESL, de 1929 en HES (altnivelaj lit. vesperoj kaj konstanta kursgvidado.). En 1932 li komencis instrui laŭ la memverkita lumbildmetodo (v.) kaj de la sama tempo gvidas sukcesajn kursojn en Svedlando; dum unu jaro 20 kursoj kun ĉ. 500 kursanoj, kaj 32 prelegoj plejparte pri Hungarujo. Kunlaboraĵoj en »H. Heroldo«, »HDE«, »Litova E-Revuo«, »Pola E-isto«, »Sveda E-Gazeto« kaj »L. M.«, kies red. li estas. Verkoj: »Poemaro el Hungarlando« (poemtradukaĵoj), 1929; »Pentroarto en la Malnova Hungarujo«, traduko de riĉe ilustrita verko de Genthon, 1932; »Trans la Fabeloceanon«, originalaj noveloj kaj poemoj, 1932; sprita lernolibro, 1932; kunlaboro al »Hungara Antologio«, 1933. Kunlaboris ankaŭ al la »Sveda Antologio«; lia novmetoda gramatiko aperis en 1935. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Szilágyi Jenő, hungaro, d-ro, advokato. Nask. 27 sept. 1877 en Temesvár (nun Timișoara en Rum.). E-isto de 1908. Ĉefsekr. de HES de 1933, jura konsilanto de diversaj ES-j. — Ankaŭ lia edzino agas aktive por E.

Szmurlo (ŝmurlo), Vladimir von, ruso, relvojinĝeniero. Nask. 15 jul. 1855 en Ĉeljabinsk (Siberio), mortis 27 febr. 1931 en Riga. Studis en Peterburgo. Post rusa revolucio loĝis 1905—1908 en Stuttgart, de 1908 en Riga. Volapükisto, tre frue aliĝis al E. Iniciatis la unuan literaturan E-konkurson en Peterburgo, 1896. Eld. Bibliotekon de L. I. E 1895, Jarlibron E-istan, 1897, E-an Universalbibliotekon, 1910—1914, kolekton de E-originalaĵoj »Verda Radio«, 1911. Fondis 1910 kaj prez. ES »Riga Stelo«. UEA-del. en Riga, 1910—15. Kunlaboris en »La E-isto«, »Int. Scienca Revuo«, »L. I.«, »Scienca Gazeto«, red. kaj eld. revuon »Riga Stelo«, 1910—1911. Verkis ANA — Alfabeto Nomaro-Adresaro — (unua provo de E-enciklopedio), 1916. Kom-

pilis Komplementaĵo rus—E-an vortaron, 1916. Dum siaj lastaj jaroj precipe interesigis pri ĉiuj sistemoj de L. I.

Sako. La ŝakludo estas unu el la fenomenoj, kiuj proksimigas inter si la homojn kaj naciojn same kiel la lingvo. Ĝi havis jam en la antikvaj epokoj grandan signifon en la int. sociaj rilatoj. Ĝi estis la unua amuza okupado, per kiu kuraĝadis la ŝakludantoj migri en fremdajn landojn, por mezuri siajn fortojn laŭ la sama maniero de la nuntempaj sportistoj. Historiaj verkoj aludas multfoje pri tiaj okazintaĵoj. Th. Hyde raportas en sia verko, (1694) ke la jugoslavoj eĉ koresponde ludadis kun la komercistoj Veneciaj.

Al la ŝako dediĉis sian atenton jam Z, kiu en 1892 aperigis en »La E-isto« kelke da ŝakproblemoj. Same okupis sin pri la ŝako en 1910 la »German-Aŭstria E-isto«, kies ŝakfakon gvidis S. Steiner. En la plej nova tempo estis HDE kaj »La Sulo«, kiuj okupis sin per la ŝakajoj. Gravan atenton por tiu ĉi ludo montris UEA per fondo de modela ŝakangulo en 1921 en sia oficiala organo. Ĉi tiu ŝakangulo estis seninterrompe datrigata ĝis 1927. Ĝin red. per sia ŝakarto jam konata faka verkisto Fr. Hájek el Praha. La angulo reproduktis ne nur la kutiman materialon, sed alportis ankaŭ sufiĉe da originalaj problemoj de alta arta nivelo. Aktive partoprenis en ĝi 170 s-anoj, apartenantaj al 35 nacioj.

Al la III-a kongreso de la tutmonda organizado de la ŝakistoj, 1926 en Budapeŝto, estis proponite de P. Balányi kaj Fr. Hájek uzi E-n por la organizaj aferoj. La propono ne estis por la nuna tempo akceptita, sed la organo de la federacio klarigis sin preta akcepti kunlaboraĵojn presotajn en E.

E montris ankaŭ novan vojon al la ŝaka problemarto, ebligante la kunlaboron de diversaj problemskoloj. Tion oni povas vidi ekz. ĉe Bailey kaj Hájek. Apude estas reproduktata karakteriza speco de simila problemo de tiuj aŭtoroj. Postulata estas sinmato per la 5-a movo. Al la motivo de B. donis H. la surprizigan

ŝlosilon kaj pliriĉigis la ludpovon de la nigra peono. La solvo estas jena: 1. Td4-d8, e7:f6, 2. e6-e7, f6-f5, 3. e7-e8d, f5:e4, 4. Kh5-f3, e4:f3, 5. De8-b5, f3-f2m.; 3... f5-f4, 4. De8-f7, f4:e3, 5. Df7-f2s, e3:f2m.; 4... f4-f3; 5. Df7-c4, f3-f2m. — E aplikas la algebran sistemon de ŝaka notado pro ĝia ĝenerala int. komprenebleco.



Koncerne la terminaron estu notite, ke estas ĉefparte obeataj la spertoj de la miljara historio de sinsekva evoluo de la ludo. Tiel estis baldaŭ forlasita la maniero, devenanta el la frua tempo de E, laŭ kiu oni insistis traduki veran aŭ supozatan enhavon de la fakaj esprimoj. Tiuj esprimoj devenas plejparte el la oriento, kaj ili estas kvazaŭ la simbola tradicio de la ŝakludo. Tial ne perdiĝis la antikvaj radikoj el la vortoj: peono (rememoras la antikvan pedon), kuriero, damo (ne reĝino), kampo, aroko (rememoras roĥi aŭ rocco), pado (S. Franz, patt), mato aŭ smato (Paluzie proponis ŝmato, kiu estas plimallongigo de ŝakmato. Hájek uzas smato, ĉar la radiko »mat« signifas nian »mort«, kiu ofte transiras en la naciaj lingvoj en »smert«. Per la sammaniera antaŭmeto de la litero »s« estas celata diferencigo inter la du konataj samsonantaj vortoj.)

Per originalaj laboroj el la sfero de la ŝaka problemo reprezentis sin el la E-istaj vicoj H. T. Bailey, W. Chmellarz, J. Paluzie, Fr. Hájek, J. Smutny.

Ŝaka literaturo en E: Paluzie: Sesdek ŝakproblemoj, kun bona faka vortaro kvinlingva, kompilita helpe de F. Pujula Vallès, Barcelona 1909. »Un artista en Ajedrez«, hispanlingva biografio de la ŝakproblemisto V. Marin, kun traduko E-a, Barcelona,

1913. — »The Chess Review«, Manchester, 1907, enhavis specialan ŝakfakon en E, red. de alia bona ŝakverkisto kaj E-isto E. T. Blanshard. (La cititaj verkoj mankas el BIL.)

FR. HÁJEK

Noto de M. C. Butler. »Mato« ŝajnas pli bona, ol »ŝmato.«

Samla Jiri, ĉeĥo, oficisto de Radio-stacio en Brno. Nask. 17 sept. 1913 en Brno. E-isto de 1927. Ofte parolis en E-a disaŭdigo el B. Tradukis plurajn tekstojn por disaŭdigo. Verkis broŝuron ĉeĥa-E-an »Per postmarko kaj E ekkonu la mondon«, 1934.

Sapiro Jakobo, ĵurnalisto en Bialystok, prez. de la unuigo de ĵurnalistoj por la B-a regiono. Nask. 26 okt. 1897. Dum 1919—21, sekr. de sia urbo, li uzis ĉiun okazon por kolekti datojn pri la naskiĝo de Z. Li sukcesis elmontri al la urbestro kaj ankaŭ al aliaj oficialaj fakuloj la gravan signifon, ke Z naskiĝis en tiu pola urbo. Sekvoj: strato kaj memortabulo pri Z kaj plano de granda monumento, postkongresoj ktp. S. estas tre agema ĉefdel. de UEA, prez. de la loka EG de pli ol 10 jaroj. Lia prop. laboro estis plej signifa dum la mondmilito; laŭ la tiamaj spertoj li kompilis la verkon »La mondmilito kaj E«, 1915. Li estas unu el la plej humorstilaj E-istoj, sub ps. Joŝo publikigis »Babiladoj de bonhumora Zamenhofano«; verkis ankaŭ »Humoraj Felietonoj«. Li kunlaboras al L. M. kaj aliaj E-gazetoj. Dum la Int. Floraj Ludoj li estis ofte premiita.

E. WIESENFELD.

Sarapova Anna, rusino. Nask. 1863, mortis 1923. Tre fervora prop-istino en Kostroma. Ŝi multe kunlaboris en la E-gazetaro. En apartaj libretoj aperis ŝiaj tradukoj »Kaŭkaza kaptito«; »La morto de Ivan Iljiĉ« de L. Tolstoj kaj »E kaj Vegetarismo«. Dum la milito ŝi loĝis en Svislando kaj ŝia reveno al Ruslando en 1920 multe helpis al restarigo de int. E-tilatoj post la milito inter rusaj kaj alilandaj E-istoj.

Satunovskij Samuil, sovetiano, hebreo, matematikisto. Nask. 1859, mortis 1929. Li laboris en Germanujo kaj Svislando, poste loĝis en Odessa kiel

privatdocento en ties Univ. Post la revolucio Ŝ. fariĝis prot. en instituto de popolklerigo kaj en politeknika instituto en O. Aŭtoro de gravaj verkoj pri matematiko kaj logiko. Pioniro de E en la unuaj jaroj de E-movado en O. li vigle kunlaboris kun V. Gernet kaj A. Kofman. En 1896/97 li partoprenis en juĝanta komitato de lit. konkurso de la Peterburga ES. Kunlaboris al la Fund. Krestomatios.

Ŝĉavinskij Timofej Aleksandroviĉ, ruso. Nask. en 1862, loĝis en Melitopol, poste en Petrogrado, mortis pro malsato kaj aliaj travivitaj krizoj en 1921. Fervora E-isto jam de la unua epoko. Estis prez. de M-a filio de la ES »Espero«. Multe tradukis kaj verkis en E, redaktis lit. almanakon »Verda Radio« kaj eldonis artiste presitan de li mem hektografe, reuon »Feĉo«.

Ŝi. Romano de H. R. Haggard, trad. de G. J. De Genkam p. 1934, 273 p. »Majstrajo de angla literaturo... La lingva stilo estas flua... Kiel E-a literaturo, la verko entute estas bona... Kiel traduko, tamen, ĝi malsukcesis... Neniu traduko estu entreprenata de alilingvano.« (M. C. B., »The British E-ist«, nov. 1934.)

Ŝibajama Kei, japano, bonzo. Nask. 30 nov. 1894 en Kyoto-si. E-isto de 1925. Sekr. kaj unu el la fondintoj de J. Budhana Ligo E-ista. Red. de »La Lumo Orienta«. Verkis: »Historieto de la Nanzenji templo. La dek bildoj de Bovpaŝtado«, 1930.

Ŝidani Bahmen, persa princo en Teheran. Unu el la pioniroj de E en Persujo. Estante bahaano, en 1914 li sciigis, ke Abdul Baha rekomendis al siaj adeptoj lerni E-n. Post kelkaj monatoj li jam posedis E-n, kaj komencis propagandon inter la bahaanoj. En 1916 li havis inter ili 10 instruistojn de E. Samjare li edziĝis je E-istino, Muĉul Mossover.

Ŝidlovskaja Maria Ivanova, rusino, sanitara statistikistino (en Dmitrov). Ellernis E-n en 1907. En 1908-12 ĉiuserne entreprenis E-vojaĝojn en Germanujon kaj Hungarujon. Prop. kaj kursgvida laboro. Ŝi faris tradukon de ĉ. 100 literaturoj, el kiuj 9 aperis en apartaj eldonoj, 38 en diversaj gazetoj kaj multaj ankoraŭ en

manuskriptoj; la plej gravaj: »Princo Serebrjanij« de A. Tolstoj, »La sonĝo de Makaro« de V. Korolenko kaj »La kapitanfilino« de A. Puŝkin.

Ŝidlovskij Konstantin Ivanoviĉ, (ps.: Iks Voldiŝ), ruso, d-ro, kuracisto, frato de Ŝ. M. I. Nask. 20 febr. 1853 en Kazanj, mortis 9 apr. 1920 en Moskva. Ampleksa fakliteratura agado. E-isto de 1890. Laboris multe por TEKA, verkis artikolojn pri E, parolis en E dum la int. med. kongreso en Budapeŝt, 1909.

Ŝigemacu Takizo (—zoo), japano, dir. de ŝovila kompanio. Nask. 9 apr. 1901 en Hyōgo-ken. En jul. 1923 gvidis E-kurson por Oomoto-anoj, kio estis la unua paŝo de E en O-ismen. — (Kuw.)

Ŝi kliniĝas por venki. Unu el la plej bonaj ang'aj komedioj, de Goldsmith, trad. Motteau. 1904, 79 p.

Ŝimizu Kacuo, japano, estro de agronomia lernejo, Hiratuka. Unu el la dir. de JEI. — (Kuw.)

Ŝimomura Joŝiŝi, japano. Nask. 15 jan. 1904 en Nagoya. Laboris ĉe E-fako de Kiboŝa, Tōkyō. Lastatempe multe tradukis nuntempajn literaturojn: »Infanmurdo«, teatraĵo, 1930; »Unu Biletto«, detektiva rakonto, 1930; »Ora Masko« (same), 1931.

Ŝindo Seitaro, japano, unuaklasa importisto. Nask. 14 marto 1902 en Osaka-si. E-isto de 1919 kaj aktive kunagas kun la tutmondo. Prezentiŝ al Komerca Universitato de Tōkyō kursofinan tezon pri int. lingvo kaj komerco kaj provon de Ekonomia Terminaro. 1927 kun aliaj fondis kaj gvidas Osaka E-societon, kiu estas la plej potenca, bone organizita el ĉiuj lokaj grupoj en J-ujo. Ĉestis la UK en Budapeŝt, 1929. Per bela, forta voĉo faris E-radiokurson de JOBK por 1931 kaj 1932, ĉiufoje pli ol dek mil tekstoj venditaj. Prezidiŝ diskutojn ĉe kelkaj J E-Kongresoj.

Sirjaev Ivan Genadieviĉ (ps. Ivan Malfeliĉulo), ruso, unue instr., de 1904 pastro vilaĝa en Vologda. Nask. 11 apr. 1877 en Vereteja, gub. Jaroslavl, mortis 23 okt. 1933. Post lia morto 6 nov., 11 nov. kaj 1 dec. pastro K. M. Kolobaŝkin okazigis di-

servojn en E je lia rememoro en la preĝejo de Lomigory. E-isto de 1895 kaj dum sia tuta vivo li seninterrompe uzis E-n. Partoprenis la lit. konkursojn de SFPE, »La Ondo de E«, Int. Floraj Ludoj, ktp. Kunlaboris al »L' E-iste«, »L. I.«, »La Lumo«, »La Ondo de E«, »Kataluna E-isto«, »L. M.«, ktp. Verkoj: »Sep rakontoj«, 1906; »La ciganino«, rakonto en brajla preso, 1907; »Tra la loko ensorĉita«, 1913, »Forta impresio«, 1914 kaj »Peko de Kain«, 1933, ĉiuj tri originalaj rakontoj. Gravaj tradukaĵoj restis en manuskripto: »Fratoj Karamazov« de Dostojevskij, »Milito kaj paco« de L. Tolstoj, »Liturgio« laŭ la ordo de S. Johano Orbuŝulo. Al li apartenas ankaŭ grava iniciato: dum daŭro de kelkaj jaroj ĝis majo 1930 li kompilis 2092 alfabete ordigitajn artikolojn kaj artikolojn sub titolo »E-Enciklopedio«. Tiu ĉi laboraĵo fariĝis la kerno de la nuna Enciklopedio kaj pro siaj meritoj li ricevis la titolon »iniciatinto-ĉefredaktoro«.

Siŝmanov Ivan D., bulgaro, d-ro, univ. prof. de literaturo, eksministro de la instruado. Nask. 22 jun. 1862 en Sviŝtov, mortis 23 jun. 1928 en Oslo. (Norv.). Donis senrezerve sian apogon al la E-movado kaj multfoje demonstraciis sian E-istecon. En 1912 prelegis pri E en la Univ. de Sofia (aperis en broŝuro, tri eldonoj). Estis honora prez. de BEA.

Skarvan Albert, slovako, d-ro, kuracisto; verkisto. Nask. 31 jan. 1869 en Tvrdošin, mortis 29 marto 1926 en Liptovsk Hrádok. Verkis kaj eldonis kun Ĕvstifejev la slovakajn tradukojn de »Fundamento« (1907), kiu estis la unua libro slovaklingva pri E.

Slosiloj. »Bonan ideon havis la brita propagandisto Herbert F. Höveler. Estas la ŝlosilo de E, malpeza kaj malkara eldonaĵo, kiu estas aldonebla al letero. Ekzemple E-isto skribas al ni en lando, kies lingvon li ne komprenas. Li skribu en E, kaj aldonu la ŝlosilon. Tio estis la primitiva ideo, kiu certe varbis al nia movado pionirojn en multaj lokoj. Laŭ la angla elparolo de komencliteroj de 1 eldoninto, oni nomis tiujn libretojn »Ĉeteĉ-ŝlosiloj« (Laŭ UEA-jarlibro 1930, p: 45.) La ŝlosiloj havis gravan rolon

precipe antaŭ la milito, nuntempe plenumas gravan servon ĉefe la ŝlosiloj en malgrandaj, ekzotikaj lingvoj, kies E-a ŝlosilo ofte estas la unua serioza pionira paŝo. La ŝlosiloj enhavas la mallongan gramatikon kaj vortaron naci lingvan E-an, la aranĝo kaj aspekto de la libretoj estas similaj. La aperigon de la ŝlosiloj prizorgis de 1925 ICK, nun UEA. Laŭ la normo de ICK ĝis 1933 ekzistis ŝlosiloj en 26 lingvoj. Kelkaj ŝlosiloj presigis en multnombraj e-roj, ekz. la sveda ĝis 1933 en 140 mtoj. (1. la kajerojn de la Oficiala Dokumentaro.)

Smurlo. v. Szmurlo.

Spicer Mavro, kroato, majoro en pensio en Zagreb, 71 jara. Pioniro, tondis en 1908 la organizon Unuiĝo de kroataj E-istoj en Zagreb, eldonis samjare lernolibron kaj broŝuron. En 1909 verkis gramatikon kaj redaktis gazeton »La Kroata E-isto«. En 1912 eldonis la antologieton »Kroataj Poeziaĵoj«, en 1932 aperis de li traduko de la nacia hero-eposo »La Morto de Smail Aga Ĉenguiĉ« de Mazuraniĉ. Originalaj poemoj, recenzoj kaj propr. artikoloj.

Stamers Rudolfs, latvo, telegrafa oficisto. Nask. 1895. E-isto de 1924. Fondis 1929 ES »Estonto« en Liepaja. Kursgvidanto. Del. de UEA en L. de 1933.

Stato kaj Revolucio. De Lenin, el la rusa trad. Demidjuk. 1926, 150 p. »Tiu energia pledado estas ĉefe komentario de paĝoj ĉerpitaj el Marx kaj Engels. La tuto apogas sin sur senĉesa akra kritiko de 1 demokratiaj socialistoj. La traduko estas taŭga.« (G. S., E., 1926, p: 13.)

Supichová Julie, ĉeĥoslovakino, pens. faka instr. en Praha. Nask. 27 jan. 1884 en Studenice. E-isto de 1907. Fondis E-rondojn. Propagandas precipe pere de gazetoj (ĉefe portanaj kaj instrufakaj). Grava sukceso: de marto 1929 aperas preskaŭ ĉiusemajne E-rubriko en la granda ĵurnalo »Narodni Politika«. Verkis lernolibron, lernolibreton por junularo, E-Ĉ konversacian libron, ampleksan legolibron, propr. broŝurojn ktp. Kunlaboris al »La Progreso«, »Kulturo«, »E-ista Voĉo«, »Germana E-

isto», »Int. Ped. Revuo«, ktp. En 1920—23 eldonis monatan prop. gazeton »E-sky Zpravodaj«.

Sustr Jaroslav, ĉeĥoslovako, komercisto-detalista en Praha. Nask. 6 dec. 1901. E-isto de 1917. Partoprenas ak-

tive en prop. de 1921 kiel funkciulo de ĈAE, UEA kaj aliaj organizoj. De 1927 prez. de EK en Praha, de 1932 ĝen. sekr. de ĈAE. Komerca reprezentanto de HDE en Praha.

Svebo. v. Ritmo.

T

TAGE, faka asocio de la E-istaj instruistoj. v. Instruistoj.

Tago de la libro. Dum la UK en Danzig, 1927, J. Baghy pere de P. Balkányi proponis, ke la 15-a de dec. (naskiĝtago de Z) estu ĉiujare la tago de la E-literaturo, do festo de la libro. La kongreso unuanime aprobis la ideon kaj jam dum tiu jaro la E-istoj aranĝis librofestojn en la tuta mondo je tiu dato. De tiam oni konsideras morala devo de ĉiu »vera« E-isto, okaze de tiu ĉi tago aĉeti minimume unu E libron.

I. SIRJAEV

Tagulo, ps. de Hyams. v.

Tagblatt Bibliotek estas la nomo de libroserio, eldonata de Steyrermühl Verlag, granda eldonejo en Wien En tiu serio aperis en la redakto de Dr. Emil Pfeffer 20 numeroj. Ili estas ĉiuj dulingvaj verkoj celantaj instrui al germanlingvanoj E-n kaj multaj el ili atingis eldonkvanton de 15.000. La unua aperis en 1925, la lasta n-ro en 1931.

TAK — Tutmonda Asocio Kolektanta. v. Kolektado.

Takács (takaĉ) József, d-ro, hungaro, (dent) kuracisto. Nask. 24 jul. 1890 en Nagyigmánd. E-isto de 1909. De 1910 laboras aktive. En 1913 li batalis kontraŭ Marich. En 1914 sekr. de HES. Post la milito ĉefsekr. de HES ĝis 1928 kaj red. de »H. E-isto«, 1923—26. Red. de »Tutmonda Kolektanto« kaj prez. de TAK. Red. de »H. Heroldo« 1932—34. Verkis E-H vortaron, prop. broŝuron, katalogon de la E-a gazetaro (1934).

Takagi Hiroŝi, ps. de Ooŝima-Joŝio. (v.)

Takahaŝi Kunitaro, japano, inĝeni-

ero. Nask. sept. 1866 en Kuroisi, Aomori-ken. Por akceli la disvastigon de E kaj ankaŭ por la aŭtoritato de J. lingvo, energie bataladas buŝe kaj skribe kontraŭ instruado de fremdaj — precipe angla — lingvoj en mezgradaj lernejoj en J-ujo. Li bedaŭras: se Z estus sciinta J. lingvon, li povus esti trovinta ion utilan por sia gramatiko, kvankam nun E elparolo kaj aliaj estas similaj al J. lingvo. Al int. teknika kongreso, Tokyo, 1929, li prezentis kun aliaj proponon pri akcepto de E.

Takakusu Zyunziro (junjirō), japano, emerita prof. de Imp. Univ. en Tôkyō, membro de Imp. Akademio, aŭtoritatulo de la sanskrita lingvo. Ĉefkompilanto de aŭtentika teksto de ĉinlingva tripitako. Estis unu el la dir. de JEI.

Takeuĉi Tookiĉi, japano, pentristo. Nask. 17 dec. 1895 en Yamanaka, Isikawa-ken. E-isto de 1915. Liaj duklopodoj: enkonduko de E en elementajn lernejojn (verko: Provo de la Unua Legolibro, 1932) kaj realiĝo de budaismaj verkoj en Z-a lingvo (verko: »Budao«, 1933; »Budaisma Fakvortareto«, »Notoj pri Sonoj kaj Literoj de Sanskrito«, 1934). — (Kaw)

Talmey (tami) Max, d-ro, usonano. Fondinto kaj prez. de EG de urbo New York en 1905, aŭtoro de lernolibro, estis ano de LK de 1905.

Tamminen Aino Elmi, finnino, instr. Nask. 1 majo 1884 en Mikkeli. Ĉefa intereso: porabstineca labore inter infanoj. E-isto de 1908. Kursoj por infanoj kaj plenaĝuloj. Prez. de E Ligo de Finnaj Instruistoj, estrarano de EAF. La komuna hejmo de ŝi kaj Tyne Leivo, estis gastama ren-

kontejo de en- kaj eksterlandaj s-anoj dum multaj jaroj, kiam klubo vivo en Helsinkí ne ekzistis.

Tarantiková Anna, ĉeĥino, oficistino en Praha. Nask. 12 febr. 1899 en Novy Losimthal. E-isto de 1923. Aktive kunlaboris en komitatoj de ĈAE kaj loka klubo, verkas en prop. gazetoj, multon vojaĝis.

Tarnow (tarno) Paul Friedrich Wilhelm, germano, dipl. inĝeniero, maŝinkonstruisto kaj provinca konsilanto de maŝinaferoj en Düsseldorf. Nask. 17 jul. 1881 en Barmen. Propis E-n en Hannover, Super-Silezio, Elberfeld, Düsseldorf kaj Kiel. Fondis: 1907. EG en Hannover kun pli ol 100 ano, estis ĝia prez. ĝis 1909. Kanfondis en 1908 en Lüneburg la Nord-Okcidenta Ligo-n kaj fondis en sept. Super-Silezia E-Ligon kaj en 1911 en Elberfeld la EG Verda Stelo. Partoprenis je la fondo de UEA en 1908 kaj estis ĝia del. 1908—10 kaj 1928-hodiaŭ. Estro de la ekspozicia tako de GEA 1910—21. Prez. ekde 1912 la int. Asocion de E-istaj Fervojistoj. Ceestis 8 UK-jn. Posedas unu el la plej grandaj E-aj bibliotekoj kun pli ol 2.000 volumoj kaj la plej grandan arĥivon de la mondlingvaj gazetoj, gvidiloj kaj katalogoj (nur tre malmultaj mankas). Red. de la »E-Kolektanto«, 1922, kunlaboranto de diversaj gazetoj. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Tatterley. Romano de Tom Galton, el la angla trad. A. Wilson. 1912, 198 p. »Lia heroo, avarulo, povas vidi reale per propraj okuloj tion, kio okazas sur la tero post lia ŝajna morto. Preskaŭ laŭsilaba traduko... Oni tro vidas la anglan ostaron sub la E-a haŭto.« (Ned Katryn, »L. L.« 1913, p: 159.)

Taubmann Josef, germano ĉeĥoslovaka. Verkis lernolibrojn, 1913, 1920; kompilis »E-a Krestomatio«, 1921. Estis red. de »Marto« de 1910 (Haida).

Taussig (täusig) Alexander, aŭstria, farmacia magistro. Nask. 24 aŭg. 1865 en Temesvár (Hung.); nun Timiŝoara en Rum.). Estis kas., del. poste hon. ano de Unuiĝo-Wien. Viceprez. de Laborkomitato de Vienaj ES-j. Nun viceprez. de Viena E-Unio. Tra-

dukajoj kaj originalaj artikoloj aperis en »Aŭ. E-isto«, HDE kaj »E.

Teatro. La unua teatra prezentado en E okazis 27 sept. 1896 en Smolensk, kie junaj E-istoj ludis komedion »Unua brandfaristo« de L. Tolstoj, trad. de V. Burenkov. Tio estis nur komenco primitiva. Serioza prezentado de teatraĵoj en E komenciĝis en 1905, kiam dum la 1-a UK sep diversnaciaj amatoroj ludis »La edziĝo kontraŭvola« de Molière. La ĉefa kaj preskaŭ unusola ebleco por prezenti teatraĵojn en E, restis daŭre la UK-j, kie oni ludis — ofte ankaŭ profesiaj aktoroj — diversspecajn teatraĵojn, kiujn la multnacia aŭskultantaro akceptis preskaŭ ĉiam kun granda entuziasmo. Provoj por organizi aktoraron, kiu ludus en diversaj landoj E-lingvan programon, ĝis nun havis nur efemeran vivon. Sur la tereno de la perradia teatraĵo signas promesplanan iniciaton la aktorgrupo ĉe Radio-Brno. v. Trakt.

Teichfeld (tejhfeld) Ignaco, polo, inĝ. Nask. 1874. Fervora prop-isto. Multjara del. de UEA. Verkis lernolibrojn en pola, germana, franca kaj angla lingvoj, kaj manĝoliston sub titolo »Bonan Apetiton«.

TEJA — Tutmonda E Junulara Asocio. v. Junularo.

TEKA — Tutmonda E-ista Kuracista Asocio, v. Medicino.

Teknika Medicina Vortaro. Verkis Briquet. 1932. 360 p. Enhavas 3675 radikojn kun necesaj klarigoj en E, kun derivaĵoj kaj tradukoj en diversaj lingvoj.

Tekniko, v. Scienco kaj Tekniko.

Telefono, v. PTT.

Telegrafo, v. PTT.

Telling Jakob, nederlandano, poŝt-oficisto. Nask. 25 nov. 1896 en Oldehove, Groningen. E-istiĝis post la milito. En G. kunfondis EG, poste en 1929 transloĝiĝis al Rotterdam. De 1931 ĉefdel. de UEA. Kursoj, artikoloj, laboroj por ILEPTO, organizo de karavanoj kaj vojaĝoj.

Tellini Ahilo, italo, d-ro en natursciencoj, naturisto, geologo. Nask. 25 febr. 1866 en Udine. E-isto de 1901. L. K. Korespondanto de la Akademio por ladina lingvo. Komitatano de UEA ĝis kiam la registaro permesis aparteni al int. institucioj. Antaŭ la mi-

lito li faris centojn da prop. paroloj en Venecio kaj Emilio kaj kelkajn dekojn da rapidaj kursoj. En 1912 li fondis la Italan Katedron de E. Dum la neŭtraleco de Italujo li peradis la korespondadon inter la militkaptitoj, internigitoj kaj iliaj familioj. Li tradukis verkojn de Pellico, Rajberti, Nievo; kompilis gvidlibron de Ravenna, gramatikon kaj sintakson de E, plenan E-I-vortaron. Estas preta por la publikigo kolekto de pli ol 1500 popolkantoj (parte de li kolektitaj) de italaj slovenoj, kun interlinia traduko E-a.

Tenisov Vito'd Konstantinovič, ruso, eksoficiro. Nask. en 1872, mortis 25 nov. 1922. E-n ellernis en 1893 en Nijnij kaj altiris multajn oficirojn al E. En multaj urboj agis por E. Siajn lastajn jarojn li pasigis en malriĉeco en Barnaul (Siberio), kie fondis EG-n kaj eldonis maneskribatan rondirantan gazeton »Fajrreĉeno«.

Tenisson Jaan, estono, antaŭe tajloro, nun kampulo. Nask. 30 sept. 1864 en Viljandimaa. Kiel paŝtista knabo lernis volapükon. E-isto de 1891. Unu el la unuaj E-pioniroj en Estonujo. Iniciatis la movadon en Narva, kaj en la tuta lando. Eldonis je propra kosto E-ajojn kaj propilojn, subtenis la eldonadon de lernolibroj. Fondis en Narva la unuan E-librovendejon, presejon kaj bibliotekon. Korespondis kun Z. Dum la estona-rusa milito en 1919 brulego detruis lian tutan havaĵon, la E presejon ktp. tiam li transloĝiĝis al kamparo, malaktivigis, perdante pro la katastrofo siajn energion kaj bonhumoron.

Tenneson (tenson) Paul, franco, prof. en Paris, mortis sept. 1905. Unu el la kunfondintoj de SPPE (1898) kaj de la Pariza Grupo, 1900. Helpis al de Beaufront, nome pri la ekzamenoj. Postlasis trad. de Molière: »Le Malade Imaginaire«, neniame presita.

Teodorescu (teodoresku) Alex. Pr., rumano, advokato. Mortis sur la baltokampo en 1916. E-isto de 1907, estis daŭriginto de la laboro de Robin ĝis la milito.

Teorio de Esperanto, helpita por superaj E-kursoj. Verkis V. Varankin. 1929, 70 p. Enhavo: Enkonduko

en la teorion de la int. lingvo; Genealogia klasifiko de lingvoj kaj etimologio de E-a radikaro; Fonetiko de E; Morfologio kaj Sintakso de E.

Teozofio. Religifilozofio, klopodo por Diokono. En 1875 de Helene Blavatsky kaj kolonelo Olcott estis fondita Teozofia Societo en Newyork, kies celoj estas: 1. Formi kernon de universala frateco de la homaro sen distingo de nacio, kredo, sekso kaj kasto. 2. Instigi al kompara studado de religioj, filozofioj kaj sciencoj. 3. Esplori la neklarigitajn leĝojn de la naturo kaj latentajn kapablojn de la homo. En 1911 fondiĝis ankaŭ Teozofia E-a Ligo, kies celoj estas konigi E-n kaj T-n reciproke, uzadi E-n kiel int. lingvon de la T-a Societo. En E aperis kelkaj broŝuroj pri T. kaj la ampleksa romano teozofia »Fatala ŝuldo« de Lionel d'Alsaŭce. En 1913 aperis organo de TEL »Espero Teozofia«, en 1928 ĝi havis sian 10-an jarkolekton. Pri la agado de TEL en la lastaj jaroj mankas informoj.

Terminaroj, v. Lingva Komitato (parto: Teknikaj Vortaroj) kaj Scienco.

Terricabras (terrikabras) Josep M., kataluno, d-ro kuracisto. Nask. 12 sept. 1878 en Vic, mortis samloke 9 jan. 1928. E-isto de 1907, prez. de la loka EG, membro de la komitato por gastigo de la aŭstro-infanoj post la milito. Prop. artikoloj.

The Esperantist. Kvankam multaj aliaj landoj — eĉ ne tiel gravaj — havis jam E-ajn periodaĵojn, Anglujo restis komence retenema. Nur en nov. 1903 H. B. Mudie eldonis la 1-an n-ron de TE. La antaŭparolo e-tis skribita de la fama publicisto W. T. Stead. Inter la tiutempaj E-aj gazetoj TE okupis altan lokon, enhavante bonajn lingvajn artikolojn (ofte iom danĝerajn) kaj multajn originalaĵojn de konataj E-istoj. Vol. 1: n-roj. 1—14 nov. 1903—dec. 1904—14×IV+224 p. Vol. II: n-roj 15—26, jan.—dec. 1905—12×IV+192 p. 24×19. Pro la bono de la E-a movado en Anglujo Mudie faris la oferon, enkorpiĝi TE en »The British E-ist« en jan. 1906.

P. TARNOW.

The Esperanto-Monthly. Red. William W. Mann kaj de jan. 1914 W. M. Page. Enhavis precipe kursojn kaj materialon por instruistoj (lingvostudoj, rakontoj, poezioj) Vol. I. 1913, IV+192 p. Vol. II. 1914, IV+188 p. Vol. III. 1915, 188 p. Vol. IV. 1916, 11×IV+128 p. Vol. V. 1917—13×IV+140 p. Vol. VI. 1918—13×IV+140 p. Vol. VII. 1919—13×IV+136 p. 24×15. En jan. 1920 TEM estis enkorpigita en »The British E-ist«.

P. TARNOW.

The Esperanto Publishing Company Limited estas eldonejo, fondita en februaro 1928 de E. Robertson, E. W. Willcocks kaj C. C. Goldsmith. Nunaj direktoroj la samaj personoj kaj K. R. C. Sturmer. Kapitalo (sept. 1933.) pundoj 565.— Dividendoj pagitaj 5%, 3%, 3%. Dum la sesjara ekzisto ĝi eldonis 13 literaturajn kaj du anglalingvajn verkojn, inter ili: Dickens: La Vivo de Jesuo, unu el la plej belaj libroj E-aj. La orvaloro de ĉiuj eldonaĵoj estas ĉ. 38.— svfr.

Thevenin Lucien Jacques, franco, fakestro por int. komerco. Nask. 15 apr. 1891 en Nervieux, Loire. E-isto de 1907, aliĝis al EG en St. Etienne en 1910, nun ĝia vicprez. Du jarojn sekr. de Rodana EF. Trad. prozon kaj versojn el la franca literaturo, el kiuj aperis en L'Eclairer du Soir (Nice), La Tribune E-iste, La Ligilo, Pola E-isto.

Thieme et Cie presejo-eldonejo en Nederlando, eldonis preskaŭ ĉiujn verkojn de H. J. Bulthuis, la tradukon de Odisseias (Manders) kaj vortarojn, gramatikojn kaj laste nederlandlingve la verkon de E. Aisberg: Fine mi komprenas la Radion. La de ĝi eldonitaj libroj estas ĉiuj ampleksaj, belaj kaj tial ĝi atingis famon, malgraŭ ke la tuta eldonita verkaro ne atingis dekon dum la agado. La vendovaloro de tiuj libroj estas ĉ. 60.— frsv.

Thilander Harald Josias Eusebius, svedo, presisto, redaktoro. Nask. 25 okt. 1877 en Breared, blindiĝis 13-jara. Lernis la presadon de porblindulaj libroj. En 1908 li iĝis red. de sveda blindula ĉiusemajna gazeto kaj en 1912 red. de la gazeto porblin-

dula »E-a Ligilo«, (ĝis hodiaŭ). Tiujn gazetojn kune kun aliaj gazetoj kaj libroj li pretigas en sia presejo. E-isto de 1909. Fervora aganto, artikoloj kaj vasta korespondado por kaj pri E. Oni nomis lin profeto en la popolo blindulara.

Thilander nask. Höjer Karin, svedino, orgenistino kaj muzikinstruistino. Nask. 4 sept. 1866 en Stockholm, mortis 13 okt. 1927. Blindiĝis en la unuaj jaroj de sia vivo. Jam post 1909 vigie partoprenis la E-propagandon inter blinduloj. Edziniĝis en 1919 je Harald Th., kiu ŝi tiam jam dum preskaŭ du jardekoj helpis en lia E-laboro.

Thilander nask. Järvenpää Varma Elisabet, finnino, masaĝistino kaj manlaboristino. Nask. 1 majo 1899 en Illo. Post blindiĝo ŝi poste ricevis ioman vidpovon. Verkis originalajn E-poemojn kaj tradukaĵojn; premiita de la Floraj Ludoj. Venis Svedujon por lerni blindulprezan laboron kaj edziniĝis en 1928 je Harald Th.

Thisell, nask. Cederblad Hilda, svedino. E-istino jam antaŭ 1898. Multe kaj bone verkis traduke kaj originale dum la unua periodo de E. Artikoloj en L. I., »L'E-iste« k. a.

Tholt (toit) Pál, hungaro, prot. en Versec. Mortis en? Apartenis al la unuaj pioniroj en H-ujo. En 1904 grupfondo en Versec. Prop. broŝuro en 1905. Artikoloj en E, tradukaĵoj.

Thomas Herbert Moy, (Hometo), anglo, inĝeniero. Nask. 31 dec. 1863 en Brixton London. Ĉefa distrajo: muziko. Farigis E-isto en 1908 kaj ĉefdel. de UEA por Anglujo de 1928. Verkis kaj komponis multajn E-ajn kantojn, el kiuj »La Kongres-Amatino« verŝajne estas la plej bone konata. Kiel kantulo sin akompananta per gitaro estas tre konata inter londonaj kaj alilandaj rondoj.

Thomsen H. Th., dano, tipografisto. E-isto de 1905. Dum mutaj jaroj la ĉefa gvidanto de la E-vivo en Oslo. Fondis la unuan E-klubon en Oslo 8 febr. 1906. Pro ekestinta disputo inter la anoj de la gazeta komitato je propra risko redaktis kaj eldonigis la unuan n-ron (1 jan. 1909) de »N. E-Gazeto« (Norsk E-blad). Kunfondinto de NEL 1911. Disponi-

gis por la E-klubo propran ĉambron en sia hejmo. Aranĝis grandan E-ekspozicion en 1909. Verkis artikolojn, poemojn, lernolibrojn, unu el ili aperis en 10.000 e-roj.

Thomson (toms'n) Alexander William (ps. Avoto), brito, taksa komizo en fabrikejo de e'ektraj kabloj. Nask. 15 marto 1896 en Hammersmith, apud London. E-isto de 1911. Fondinto de grupo en Bexleyheath, (instruis skoltajn kaj belgajn rifuĝintojn), 1914. Fondinto kaj prez. de Skolta E-ista Ligo, 1918. Fond. de Psifa EL, 1934. Predikis ĉ. 12-foje ĉe E diservoj en London. Verkoj: »Rimvortaro E-a«, 1918; diversaj artikoloj kaj versoj en E gazetoj.

Thomson L. E., aŭstraliano. E-isto de 1911. Sian pioniran agadon li mem priskribis en artikolo por Enciklopedio, kies ĉefkunlaboranto li estas. v. Aŭstralio.

Tiard (tiar) Marcelle, francino. Nask. 18 jun. 1861 en Paris, mortis 1 jun. 1932 en P. Interesiĝis pri feminismo kaj teozofio. E-iĝis en 1903. Senlaca propagandistino dum 25 jaroj. Prezidis grupojn (Nice, Alger), Federacion de Provence, la Int. Teozofian Ligon, la Unuiĝon de E-istaj Virinoj.

Tieder (tider) Zsigmond, hungaro, ĵurnalisto, kunlaboranto de la laboristaj gazetoj »Népszava« ktp., tiu de multaj enciklopedioj kaj aliaj sciencaj verkoj. Nask. 1887 en Budapeŝt. Prez. de HESL dum 1927—1930. Verkis broŝuron, multajn artikolojn pri E por laboristaj gazetoj; redaktis »Antaŭen«, faris kelkdek paroladojn en la sindikatoj.

Tiflisano, ps. de la georgiano Ciklari. Mortis ĉ. 1914 (?). Verkis »Tra la mondo per E«, 1909—11, 32 p. Kunlaboris al »La Revuo«.

Tihanyi (tihanji) József, hungaro, kolonelo en pens. E-isto de 1905 (rigardinte E-lernolibron en montrofenestro). Kursoj por ofiĉoroj en Kaposvár, 1911—13. Prez. de Budapeŝta grupo de HES, 1929—30. (l. »H. Heroldo« 1933, n-ro 3.)

Timuŝ Mihaelo, rumano, mstr. E-iĝis en 1907. Kunlaboris je la organizo de l'unua E-kongreso en R. Fond. de la Societo de la R. Instru-

istoj E-istaj »Homaro«. Kunlaboris ĉe multaj E-gazetoj.

TLES — Tutmonda Ligo de E-istaj Senŝtatanoj. (v.)

Toki Zenmaro, japano, ĵurnalisto en Tōkyō Asahi. Fama J poeto. Dir. de JEI. Nask. 8 jun. 1885 en Tōkyō-si. Vizitis domon kaj tombon de Z dum UK en Danzig kaj faris belan priskribon (J), montrante ĵurnalistan observemon kaj poetan sentemon. (E-a traduko en »La Revuo Orienta«, 1929). Klopodas alprenigi latinajn literojn por J. lingvo kaj verkis: »J. Lingvon per Romazi, per Nipponsiki Romazi«, 1929.

Tolnai Elek, hungaro, reprezentanto de petrolfabriko. Nask. 25 jan. 1893 en Budapeŝt. Gvidis kursojn, ankaŭ por blinduloj. E-isto de 1914. Kas. de HES 1915—31; nun ĝia kontrolisto. Kunorganizinto de la UK en Budapeŝt. En lia parenco 9 E-istoj, inter ili lia edzino Boris Róna kaj lia 13-jara filino Ági kiu ofte deklamas aŭ kantas dum E-aj lit. vesperoj. (l. »H. Heroldo«, 1930, n-ro 5.)

Tolnai Pál, hungaro, komercisto; frato de la antaŭa. Nask. 23 aŭg. 1891 en Törökbálint. Kvinjara militkaptiteco en Siberio. E-isto de 1926. Ĉefsekr. de la UK en Budapeŝt kaj de HES en 1928-29. Prez. de la budapeŝta grupo de HES, komitatano de UEA. Kursoj, ankaŭ por blinduloj. Lia edzino Rózsí Göndör estas aktiva E-isto, kiu gvidis kursojn, tradukis novelojn. (l. »H. Heroldo«, 1930, n-ro 5.)

Tolstoj Lev Nikolájeviĉ, grafo, fama rusa verkisto. Nask. en 1828, mortis en 1910. Estis unu el la unuaj eminentaj patronoj de E. Jam 16 sept. 1889, respondante al V. Majnov, T. skribis: »Mi opinias la elieron de komuna eŭropa lingvo (t. e. int. lingvo E) afero urĝe necesa... Mi laŭpove penas disvastiĝi tiun lingvon kaj, kio estas la ĉefa, konvinkigi ĉiujn pri ĝia neceso.« 27 apr. 1894 T. skribis la famajn frazojn: »Mi konstante opinias, ke ne ekzistas pli kristana scienco, ol la lingvoscienco, la scienco, kiu obligas interrilaton kaj solidarecon kun la plej granda nombro da homoj. Mi multfoje vidis, ke ho-

moj malamike interrilatis nur sekve de la mekanika baro kontraŭ la reciproka komprenado. Tiamaniere la el-lerno de E kaj ĝia propagando estas sendube kristana agado, akcelanta la estigon de l' Regno Dia, — la agado, kiu prezentas la ĉefan kaj solan mision de homa vivo. Tiu ĉi favora rilato de T. al E ludis gravan rolon por E: la vortoj de T. estis vaste uzitaj por prop. de E. Sed samtempe kun la nomo de T. estas ligita ankaŭ unu tragedia momento en historio de la juna E-movado. En 1895 pro la artikolo de T. »Prudento aŭ kredo« la rusa car-cenzuro malpermesis importon de la sola tiama E-gazeto »La E-isto« en Ruslandon, kaj pro tio la movado suferis gravan krizon. 17 aŭg. 1909 T. denove esprimis sin favore por E, sendinte al J. Eydelmanth (Franc.) la nenie ĝis tiam eldonitan »Raporton pri paco« por ke ĝi aperu en E (aperis en Int. Socia Revuo). Nelonge antaŭ sia morto T. denove eldiris 24 febr. 1910 sian fidelan simpatian por E. Sub influo de T. la tolstoĵana eldonejo »Posrednik« (Peranto) eldonis multajn rusajn lernolibrojn de E kaj eĉ specialan serion de lit. verkoj sub titolo »Tutmonda Biblioteko je la memoro de L. Tolstoj« 1912—16. El la verkoj de T. aperis en E traduko de multaj malgrandaj rakontoj, el kiuj la pli ampleksaj estas: »Sieĝo de Sebastopolo«, »Kaukaza militkaptito«, »Du maljunuloj«, »Unu animo en ĉiuj«, »Tri mortoj«, »La morto de Ivan Iljiĉ«, k. a. Estas tradukitaj, sed ankoraŭ ne eldonitaj la romanoj »Milito kaj paco«, parte »Anna Karenina«, »Renaskiĝo«, k. a. NEKRASOV.

Tomac Stanislav, serbo. Mortis en 1932 en Argentino. Verkis antaŭ la elmigrado post milito lernolibron, gvidis kursojn.

Tomán János, hungaro, arkitekto. Nask. 29 aŭg. 1900 en Arad (nun en Rumanujo). E-isto de 1920. Li instruis, organizis, propagandis, en 1927—8 estis prez. de HESL. Li kompilis E-H kaj H-E vortarojn (536 p.) verkis gramatikojn.

Tooguu Tojosato, japano, kuracisto. Nask. 13 okt. 1894 en Tōkyō-si, mortis 24 jun. 1927 en Odawava;

multe tradukis novelojn: Ariŝima: »Deklaracio«, 1924; literaturecon: Ariŝima: »Senbedaŭre Amo rabas«, 1931. »E kurso por kuracisto«, 1927.

Torbjār (turbjer) Thersten, svedo, instruisto en Göteborg. Nask. 13 dec. 1893 en Marstrand. E-isto de 1929. Prez. de S. Instruista EF de 1932. Reprezentanto en S. por »Int. Pedagogia Revuo«. Kunlaboranto de S-E Gazetara Informo-Servo.

Torii Atuzirō, japano, instr. en b'indula lernejo de Kyōto. Kunfond. de J. Asocio de Blindaj E-istoj, 1928. Verkis en brajla alfabeto kursolibron, 1923 kaj E-J Vortaron. — (Kuw.)

Török Péter, hungaro, gimn. prof. Nask. 23 jan. 1857 en Hajduböszörmény, mortis 28 nov. 1929 en Debrecen. Tre diversflanka, krom E li okupiĝis pri mineralogio, botaniko kaj entomologio. E-isto de 1907. L. K. Estis gvidanto de la E-movado en Debrecen. Verkis lernolibrojn, (a) E-Sintakso int-e premiita, bonan E-H vortaron kaj porĉiaman kalendaron. En manuskripto kelkaj gravaj verkoj. (1. »H. Heroldo« 1929. B. n-ro 6.)

Toschi (toski) Umberto, italo, d-ro, kaj prof. de ekonomia geografio, instruas en komerca lernejo de Bologna. Nask. 10 jun. 1897 en Dozza Imolese (Bologna). E-isto de 1912. Sekr. de 7-a itala E-kongreso, 1920, de IEF, 1923—25, de Int. Konferenco por Komuna Komerc Lingvo, Venezia, 1924; ktp.

Tóth (tót) Vince, d-ro de la juro, hungaro, polickapitano. Nask. 22 jul. 1894 en Sümeg. E-isto de 1910. Kelk-jara laboro por E ĉe la polico, eĉ kurso. Gvidis la HEI, aranĝis la administracion de L. M. en 1924—26, kunlaboris por la aperigo de »La Tragedio de l Homo« (Madách), tradukis la »Kriminologion« de Vámbéry.

Toische (toĉe) Lajos, hungaro, ŝtato-ficisto financministeria. Nask. 1902 en Budapeŝt. E-istiĝis en 1919, kiam jam aperis en »Hungara E-isto« lia unua noveltraduko. Gvidis kelkajn kursojn. Red. de L. M. Verkoj: »De paĝo al paĝo« (1932), tradukoj en la »Hungara Antologio« (1933), traduko de »Vojaĝo en Faramidon« de Karinthy, recenzoj, observoj kaj poemoj en L. M. En »De paĝo al paĝo« li

kritike pristudis niajn ĉefajn verkistojn postmilitajn. Liaj kriterioj rifuzis la legolibran tradicion de niaj recenzistoj, kies kritikado estis plie lingva, ol literatura. Jam estas tempo, taksu serioze la verajn valorojn de nia literaturo, kaj la kritiko mem estu literatura formo: tia estis lia principa sinteno, kaj ĝi enhavis ankaŭ lian pretendon, ke nia literaturo jam liveras taŭgan materialon por kultureca kritiko. Lia skizaro certe pravigis tiun pretendon kaj krome starigis sian aŭtoron kaploke de nia eta kritikista elito. Verŝajne lia inspiro al kritika laboro venis el lia funde lirika naturo, kiu: »verŝus sangon por poemo«, ĉar liaj studoj estas mem literaturaj pecoj, kiuj memorigas pri la diro de Anatole France, ke »la bona kritikisto estas tiu, kiu rakontas la aventurojn de sia propra animo inter la majstroverkoj.« Kunlaboranto de la Enciklopedio.

W. B. JOHNSON.

Trakt. (Teatro kaj Radio Aktoroj). Artista skcio de la »Kulturklubo«, (loka EG) en Brno, Ĉeĥoslovakujo. Ĝiaj anoj konsistas nur el artistoj, kantistoj, verkistoj, aktoroj de la Landa Teatro. Fondintoj: Jiri Vitezslav ŝ a m l a kaj Josef B e z d i ĉ e k, anoj: f-inoj A. Novotná, Z. ŝvabiková kaj Z. Trdá; K. Urbánek, A. Klimeš, V. Leraus, K. Höger, K. Mátl, A. Fiala, d-ro Fr. Kozík. E-n ili lernis en kurso aranĝita en aŭtuno 1933 de Radiojournal Brno kaj gvidita de s-ino Marie Sirejčková. La nivelo de la E-lingvaj disaŭdigoj de la ĉeĥoslovakaj sendostacioj tiris pro la kunlaboro de TRAKT tre alta kaj la dissendoj tre ŝatataj. — (jvš.)

Tra la Esperanta Literaturo. Kompilis Ĝ i a m b e n e. 1907, 113 p., dua eld. 1908. »Antologio elĉerpita el 40 malsamaj verkoj prezentas utilan legajon, ĉar ĝi konigas la stilon de diversaj aŭtoroj.« (L. I. 1907. p:474.)

Tra La Mondo. Tutmonda ilustrita Revuo E-ista kun aktualaj, ĝeneral-interesaj, artaj, sportaj, modaj, sciencaj, edukadaj, junulaj ktp. artikoloj, demonstritaj per multaj bonaj bildoj. De julio 1905—dec. 1908 aperis 4 vol. kun 196, 212, 192, 96 p. kaj multaj kovrilpaĝoj kaj pli ol 900 bil-

doj, 29+22. La eldonistoj (red. Capé-Montrosier; presejo: A. I. Witteryck) ĉesigis la eldonon de tiu ĝis tiam plej bela E-a gazeto pro »pripensita kaj intencita kontraŭtenado« de la E-istoj kaj la E-aj gazetoj. BIL ne mencias la ĉefkunlaboranton: f-ino Oxenford. P. TARNOW.

Tra la Mondo. Int. legolibro. Unua parto, por komencantoj, tria eld. 1925, 96 p. »Lerte redaktita kolekto de proverboj, aforismoj kaj sentencoj, fabeloj, fabeloj kaj rakontoj; interesaj el la vivo kaj sciencoj; ŝercaĵoj, amuzoj kaj kantoj kun notoj.« (»British E-ist«, 1921, nov.) Dua parto, por progresintoj, 1922, 144 p. »Ambaŭ volumoj formas krestomation de neordinara intereso kaj valoro.« (E, 1922, nov.)

Tramoj. Specialaj kursoj por tramistoj okazis en multaj grandurboj. En Wien la direkco de la urbotramoj deĵorigis ankaŭ E-ĉe parolantajn konduktorojn dum toiroj ktp., unue en 1927, kaj ili portis rubandon kun E-a surskribo. Rimarkinda progreso estas konstatabla ankaŭ inter la tramistoj en Stockholm, Budapest, ktp.

Trans la Fabeloceano. Noveloj originale verkitaj de F. Szilágyi, 1931, 136 p. »Fabeloj modernecaj, por maturuloj, kie klasika porinfana formo servas al nuntempaj temoj kaj aludoj, kie delikata ironio miksiĝas kun spicita spriteco. Stilo mirinde fleksebla.« (G. S. E, 1932, p: 165.)

Tra Sovaga Kamĉatko. Verkis S. Bergman, el la sveda trad. B. Gerdman. 1932, 276 p. kun 2 kartoj kaj pli ol 90 bildoj. »Vigla raporto pri maloftaj vivantaj, kaj instrua priskribo pri fora, preskaŭ nekonnata regiono, laŭ geografia, zoologia, antropologia vidpunktoj. Stilo, taŭga, komprenebla, bona.« (G. S. E, 1932, p: 87.)

Travivaĵoj de Ro So. Originale de R. Sharpe. 1913, 93 p. »Vojaĝinte aŭ vivinte en preskaŭ ĉiuj landoj de Eŭropo kaj Ameriko, Ro So kolektis riĉan materialon de travivaĵoj, kiujn li hodiaŭ disdonas malavare al siaj samideanoj, Bona Z-a lingvo.« (G. S. E, 1922, p: 63.)

Tredgold Robert Ralph, anglo, sollicitoro. Nask. 3 dec. 1878 en Lee.

Kasisto de BEA, 1931. Tradukis himnojn por »Himnaro Esperanta«.

Tri Angloj Alilande. Romaneto, originale de J. Merchant, 1912, 95 p., dua eld. 1922, 64 p. »La aventuroj de P tri herooj estas vere malordinaraj. En ĝi E ludas gravan rolon por otfoje savi la simpatiajn anglojn, kiam nekomprene de fremdaj lingvoj minacas ilin per ĉiuspecaj danĝeroj. Simpla fluanta bona stilo.« (G. S. „E“, 1922, p: 63.)

Trickoff Radoslav Kuzmanoff, bulgaro, loĝas en Vratza. Fervora E-isto, longjara peranto de UEA.

Tridek jarojn en la Ora Nordo. Verkita laŭ la rakontado de J. We l z l, ĉeĥo, kiu pasigis 30 jarojn en la arka regiono, akiris konsiderindan havaĵon kaj fariĝis eskimestro. Trad. el la ĉeĥa »Moraviaj E-Pioniroj«, 1931, 320 p.

Tri Noveloj de Pu ŝ k i n, el la rusa trad. A. Fi ŝ e r. 1923, 67 p. »Agrabla vere romaneca karaktero de l verkoj de l unua duono de l pasinta jarcento.« (G. S. „E“, 1923, p: 183.)

Tri Verkoj de Leo Tolstoj, el la rusa trad. J. M. Kun. 1921 (?), 78 p. »Priprenoj pri tiuj tri temoj: Patriotismo kaj registaro; Al politikistoj; Pensoj pri edukado kaj instruado. Bone tradukita.« (G. S. „E“, 1922, p: 27.)

Trögel Robert, germano, d-ro fil, lerneja inspektoro. Nask. 24 apr. 1888 en Fassmannsreuth. Enkondukis E-n en la instruistan seminarion de Auerbach. Partoprenis la int. konferencon pri E en la lernejoj, Genève, 1922, kaj la int. konferencon por la uzado de E en la sciencoj puraj kaj aplikataj, Paris, 1925, kie li reprezentis la G. Sciencajn Asocion, kies prez. li estis dum kelkaj jaroj. Ekzamenkomisaro de la E-Instituto. Verkis du interesajn G. broŝurojn pri E, (1920 kaj 1930), unu tradukita en japanan lingvon. Kongreslibro por la 14-a G. E-Kongreso, 1925. Multaj artikoloj en gazetoj kaj speciale en pedagogiaj revuoj.

Trompeter W. H. germano termezuristo en Schalke. Mortis 63-jara 7 nov. 1901 en Essen. Kiam en 1891 Z perdis ĉian esperon daŭrigi eldo-

nadon de la sola E gazeto »La E-isto« pro manko de monrimedoj, li prenis sur sin ĉiujn dispezojn de la gazeto por tri jaroj (1892-94), oferis monate 100 markojn por la redaktoro. Per lia hejpo ankaŭ aperis kelkaj gravaj libroj. En 1890 fondis grupon en Schalke. Liveris materialon por »La E-isto« kaj verkis kune kun Ch. Schmidt lernolibron. Li estis kontraŭulo de la grandaj lingvaj reformoj, kiujn Z en 1892 konsideris kaj en »La E-isto« prezentis al la diskuto de la tiama samideano. Nur kelkajn aliigojn li proponis: e anstataŭ kaj, z anstataŭ s en komenco de silaboj, saman finajon a por adjektivoj kaj adverboj k. a. Laŭ Z: »En la historio de E al li apartenas ĉiam la plej grava, neniam elŝirebla, neniam elstrekebla paĝo«. (Originala Verkaro p: 222.)

Tukimoto (tukimoto) Kitadi, japano, kuracisto. Nask. 4 febr. 1881 en Okayama-ken. E-isto de 1906. Prez. de Kobe EA. UEA-del.

Tullo David Ritchie, skoto, solikitoro antaŭ la superaj kortumoj de Skotlando. Nask. febr. 1876 en Edinburgh. E-isto de 1908. Kasisto de Skota EF, 1920-27 kaj de UK 1926. Del. al la Komerca Konferenco en Venezia, 1923. Ĉefdel. de UEA por Skotlando de 1927. Komitatano de UEA, 1931.

Tunizio. (Afriko). Ankoraŭ en 1893 estis tie abonantoj de »La E-isto«. En 1900-01 tie estis E-istoj V. Macguel, Combet, Darmandaritz (en Tunis) kaj Colson (en Ain-el-Asker). En 1904 la movado estis pli vigla ol iam, dank' al la agado de kapitano A. Capé-Montrosier en Algerio. Tiam oni fondis sub lia influo E-sekcion en la Instituto de Carthage, kies prez. estis Poulain. En apr. li faris raporton en Tunis ĉe la Geografia Kongreso, kiu aligis al la »Delegacio« Poulain uzis poste (tiam ankoraŭ novan manieron de la propagando) gludadon de prop. afiŝoj de la Nordafrika EG sur kolonoj de la tramvojoj. En 1907 oni legis pri fondo de ES en Mehdia kaj Sonsse. Laŭ la Dietterlestatistiko en 1928 E-istoj estis nur en 4 urboj. En 1933 ne ekzistis UEA-del. en la lando. I. SIRJAEV.

Turismo. Komence de la jarcento (1900) la subteno de la franca »Touring Club« alportis gravajn sukcesojn por la movado. Precipe la artikoloj en ĝia organo varbis multajn E-istojn. Sed en tiu ĉi frua tempo preskaŭ ĉiu provado montriĝis nedaura. Antaŭ la milito aperis kelkaj belaj albumoj, ekzemple la oficiala eldonaĵo de la aŭstraj fervojoj. Gravan lokon okupis la turismo en la agado de UEA jam en ĝiaj unuaj jaroj. Nuntempe funkcias aparta turisma servo en la kadro de UEA, kiu iniciatis eldonon de multaj prospektoj kaj broŝuroj. Post la milito pli ol 400 urboj eldonis en E gvidlibrojn kaj gvidfoliojn. Kelkaj el ili estas tre rimarkindaj, ekz. la eldonaĵo de la itala »Touring Club« pri »Milano kaj lagoj de Lombardio«. Kelkaj E-organizaĵoj, precipe la itala kaj brita, aranĝis eksterlandajn grupvojaĝojn per helpo de E. Fondiĝis ĉe kelkaj landaj turistaj asocioj E-sekcioj (pola, estona, finna), eĉ fondiĝis en Svedlando, Estonujo, Norvegujo specialaj turistaj organizaĵoj, la E-aj Turistaj Komisionoj, kiuj jam aranĝis dekojn da sukcesaj grupvojaĝoj al eksterlando. Komence de 1935. laŭ la iniciato de H. Seppik fondiĝis Internacia Turista Asocio, kies celoj estas: aranĝi malmultekostajn publikajn ekskursojn en int. skalo, fari turistan reklamon por ĉiuj landoj; eldoni turistajn jarlibron kaj kalendaron, int. turistan gazeton ktp.

Turkujo. La unuaj konataj E-istoj estis Michel A. Arama en Saloniko, S. Kedam en Istanbul (1901), Mehmed Cevdet bej en Aidin, A. Kha-tenessian en Kerassunda. Solon Orfanidis kaj Kakobo Guéron fondis dec. 1909 E-grupetojn kaj 1910 estas fondita en Istanbul grupeto, titolita T. E-Asocio, kun 10 anoj. Ankaŭ en Smirna fondiĝis grupo kun helpo de la greka s-ano E. Misailidis. Movadeto oni rimarkis samtempe en Nazli. (la greka s-ano Johano Sapoundzoglou kaj Sidki effendi). Grandan servon faris por la E-movado d-ro Anakreon Al. Stamatiadis, kiu vivis en Istanbul 1913—25. Li fondis en 1920 tie E-Asocion »Bizantio« kaj en 1921 samnoman gazeton, sume aperis ĝis.

jul. 1924 18 n-roj kun 480 paĝoj. En tiu tempo la E-ejo estis tute vasta etaĝo de domo en la centro de Péra, Str. Sakiz-Agats, Agha Dzami No 8. lukse meblita. La luprezojn oni pagis krom la kotizoj per la enspezoj de tekoncertoj, aranĝitaj duonmonate, ekskursoj, la preskostojn de la gazeto pagis krom la abonantoj grupo de entuziasmaj E-istoj. La registaro montriĝis favora, nur ĝi postulis, ke la stampo de la asocio portu ankaŭ turkajn literojn. Poste la magistratoj malpermesis la asocian E-istan agadon, kaj nur 25. apr. 1927 oni oficiale permesis la fondon de TEA. Lastatempe la gazetaro estas pli favora. En 1931 UEA-del. en 4 lokoj.

Rimarko. La artikolon tralegis I. H. Krestanov. (Bulgarujo.)

STAMATIADIS.

Tünn Johannes, estono, poŝtofocisto. Nask. 27 majo 1899 en Tartu. Ekza ŝakmajstro de Estonujo, estrarano de EAE, EIE, prez. de »Espero« en Tallinn. Kursoj en Pärnu. Posedanto de la supera diplomo.

Turno. ps. de L. Dreher. (v.)

Tur-Strato 4. Romano originale de H. Weinhengst. 1934, 174 p. »Profunda realismo, objektiva rakontmaniero pri la sorto de la falintoj de P vivo, monro de materiala kaj anima mizero.« Flua, facila lingvo.

Turzó Péter, hungaro, fervojfocisto. Nask. 7 jun. 1870 en Privigye (nun en Ĉeĥosl.), mortis 7 jun. 1934 en Gödöllő. En 1919 E-ista ano de la propaganda servo de la kontraŭ-revolucia registaro en Szeged. Fine de la mondmilito fondis la gazeton »H. E-isto«, eldonis kaj red. ĝin dum 1918—23. Unu el la ĉefaj revivigantoj de la H. E-movado post la milito.

Tuschinski Anna, germanino, (aŭ polino?). Nask. 4 dec. 1841. Pioniro de E en Danzig de 1907, plej agema membro de la loka societo. Dum la XIX UK oni nomis ŝin »E Patrineto«.

Tutmonda Asocio Kolektanta. v. Kolektado.

Tutmonda Biblioteko je la memoro de Tolstoj, trad. Kabanov kaj Ŝarapova. 1912, 9 kajeroj entute 280 p. Religia kaj filozofia enhavo.

Tutmonda Esperanta Junulara Asocio. v. Junularo.

Tutmonda Espero. Kvankam TE nomiĝis organo de la kataluna E-istaro kaj eĉ de jan. 1909 ĝis la apero de »Kataluna E-isto« en apr. 1910 mem havis la subtitolon »Kataluna E-isto«, ĝi enhavis tiom da modelaj tradukoj kaj originaloj de bonaj literaturaroj, ke ĝi ankaŭ estis multe legata en eksterlando, tio estis la kaŭzo, ke ĝi de julio 1910 ankoraŭ aperis nur en E, kaj ke ĝi malaperis tuj je la komenco de la milito. TE tute regule aperis de jan. 1908—majo junio 1914, IV+12—16 p. 24×17. Paĝonombro: 1908: 12×IV+192; 1909: 11×IV+192; 1910: 10×IV+160; 1911: 9×IV+136; 1912: 9×IV+108; 1913: 10×IV+120; 1914: 5×IV+60. Eld. Societo Espero Kataluna. Red. E. Halabader, M. Casas, Frederik—Pujula Y Vallos. P. TARNÓW.

Tutmonda Intersteno. Monata gaz-

eto por la distruigo de la Intersteno (v.) Aperas de 1930, 21×15 cm. Red. Fr. Graser, Frankfurt.

Tutmonda Jarlibro E-ista. v. Jarlibroj.

Tutmonda Kolektanto. Kvaronjara gazeto, organo de TAK. Aperas de 1930. 23×15 cm. Red. d-ro J. Takács, Nagymaros, Hung. v. Kolektado.

Tutmonda Ligo de E-istaj Senŝtatanoj. (TLES). Int. organizo de anarkistaj E-istoj, fondita en 1924. Eldonis organon »Libera Laboristo«, aperinta neregule. (v. Laborista movado.)

BRUIN.

Tutmonda Polica Ligo. v. Polico.
Twombly (túombli) John Fogg, usonano. Nask. 2 febr. 1870 en Sanghai (Ĉinujo). Fondinto de EG en Boston (unua en Usono) kaj prez., 1905. Kunfondinto de Amerika EA, 1905, sekr. 1905—08. Red. de »Amerika E-ista Revuo«, 1907—08.

U

UABE: Universala Asocio de Blindaj E-istoj. v. Blinduloj.

Ucnomija Hajime, japano, metodisma pastro. Nask. 3 nov. 1906 en Ehime-ken. Studanto de Bibliaj vortoj en E; artikoloj en »La Revuo Orienta«, 1929—30.

UDEV: Unuiĝo de E-istaj Virinoj. Fondiĝis okaze de la UK en Budapeŝt en 1929, ĉefe per la klopodoj de s-ino Marcelle Tiard, kiu funkcias kiel prez. ĝis sia morto en 1932; s-ino Marie Borel, Lyon, sekr. por Francujo; s-ino T. Yelland, fondinto kaj mastro de la Int. Hejmo E-ista en Aspremont, Francujo, kaj s-ino Nóra Kozma, Budapeŝt, VI. András-sy-ut 5, ĝen. sekr. ekde ĝia fondiĝo. En 1932 s-ino Elise Jacobs, Flensburg, Germanujo, fariĝis prez, kaj 6 pliaj membroj akceptis la delegitecon por siaj landoj. La kotizo de unu svisa franko nun fariĝis nedeviga, por ke UDEV ricevu la subtenon almenaŭ moralan de kiel eble plej multaj E-istinoj en ĝiaj klopodoj: interesigi por E ligojn virinajn, feministajn kaj porpacajn kaj pruvi, per praktika laboro en aŭ por tiaj organizaĵoj, ĝian taŭgecon, eĉ neceson, kiel oficiala helplingvo en ĉia int. kunlaboro (ĉe kongresoj, konferencoj ktp.). De ĝia fondiĝo UDEV aranĝis fakkunsidojn ĉe ĉiu UK.

(v. Feminismo.)

AMALIA BERGER.

UEA. — Plej grava organizaĵo de E. — Jaron post jaro, recipie post la 1-a UK, sentiĝis, ke E sen reala praktikado internacia, simple kaj klare centrigita, ne havos altirpovon por reale pensanta mondo. La ideoj kristaliĝis en propono farita de A. Carles

al la 2-a UK 1906 kaj ĝi tekstis jene: »Estus oportune, havi en multaj urboj konsulojn, al kiuj oni povus ĉiam sukcese sin turni kaj de kiuj — per malgranda maklera pago — oni povus ricevi ĉiujn petitajn sciigojn, eĉ privatajn informojn pri komercistoj. Ankaŭ la vojaĝantoj ĉiam scius, kien ili povus sin prezenti por ricevi bonan akcepton kaj ĉiujn postulitajn informojn, ne ĝenante iun.« La UK decidis »Rekomendi al la societoj kaj grupoj, ke ili fondu en ĉiuj lokoj, kie estos eble, E-istajn konsulejojn, kiuj povos en la landoj, kie tiu nomo ne estus akceptata de la registaro, ricevi alian nomon, kiel ekzemple 'E-istaj Agentejoj'«. Tiu ĉi bonintenca forŝovo de la propono al la grupoj malatentis jam tiam la neceson de speciala organizo kaj de centro, tial la propono estis praktike enterigita.

Preskaŭ du jarojn poste reprenis la proponon Th. Rousseau kaj H. Hodler. En serio de artikoloj Hodler skizis la novan organizaĵon, kaj en n-ro 30 (de l 1-a majo) de 'Esperanto' 1908 aperis la informo pri la fondo de Universala Esperanto-Asocio. La unua oficiala informilo en la sama n-ro donis la formalajn kaj praktikajn detalojn de UEA.

Alia ĝermo de UEA estis la E-oficejoj la E-oficejoj, starigitaj laŭ propono de Rousseau. La unua E-oficejo estis en franca urbo Bourg en Bresse, kie vivis Rousseau, la kunfondinto de UEA.

Simpla, servopreta, malmultekosta: estas ĉefe tiuj kvalitoj, kiuj kaŭzis la rapidan kreskon de UEA. La provizora regularo aperinta en 'E' (12 majo 1908) fiksas la celojn: 1. Sub

la nomo UEA estis fondita Asocio, kies celo estas la plifaciligado de la ĉi-uspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter ĝiaj anoj. — 2. La sola lingvo oficiala de la UEA estas la lingvo E, tia, kia ĝi estas difinita per sia literatura kaj teknika vortaro. Konsekvence la UEA neniel enmiksiĝos en lingvaj diskutoj. — 3. La UEA estas absolute neŭtrala rilate al religio, politiko kaj nacieco. — Tiuj tri fundamentaj reguloj nur iom modifitaj troviĝas ankoraŭ nun en la statuto.

La unua kunveno de UEA okazis en Dresden dum la 4-a UK 1908. La tagordo enhavis la raportojn de la fakoj ekzistantaj tiam (1. administrado, 2. konsuloj kaj oficejoj, 3. turismo), kaj proponon pri kreo de novaj fakoj: komerco kaj industrio, instruado. La jarlibro mem aperis antaŭ la kongreso kaj indikis la staton de UEA: 206 delegitoj, 46 vicdelegitoj, 94 subdelegitoj, 62 E-oficejoj, el kiuj 22 plene organizitaj; ĉio en 249 lokoj kaj en 23 landoj; pagintaj membroj: 1223.

Kiel unuan etapon de la evoluo oni povus fiksi la tempon 1908—1912, de la fondo ĝis la tielnomita Financa reformo, en Krakovo diskutita kaj akceptita. La ekstera evoluo de la asocio estis videbla el la jarlibroj. Ili estas la mezuriloj plej bone videblaj de la progreso kaj de la enradikiĝo. La mizeraspektan libron de 1908, de 24 paĝoj, anstataŭis jam en 1911 broŝuro de 184 paĝoj entenantaj 885 lokojn kun delegitoj kaj konsuloj en 47 landoj. 158 E-oficejojn, 266 entreprenojn, 7804 membrojn. La forton de la asocio ankaŭ dokumentas la fakto, ke la sinteno de la gvidantaj E-istoj de tiu ĉi tempo notinde iĝis pli favora kaj komprenema. Ja ne mankis jaluzo kaj malkompreno, sed antaŭ la evidenta progreso silentiĝis ankaŭ tiuj ĉi voĉoj.

La eksplodo de la milito trafis UEA en la plej bona stato: solida konduto financa, fido ĝenerala ĉe la E-ista publiko, klaraj gvidlinioj, ĝojiga membrosato. Tre gravis, ke la delegitoj de UEA en la militantaj landoj ne estis kaptitaj de la milita

spirito. Tio permesis, ke la Centra Oficejo daŭrigu unue sian kutiman laboron, degeliĝanta al nenio dum la unuaj monatoj kaj nur time repreninta ioman amplekson post januaro 1915. La stabo, konsistinta kun la direktoro el ses personoj, malgrandiĝis je du, por poste kreski ĝis ok kaj dek, kun la libervolaj helpantoj.

UEA dissendis dum sept. 1914. cirkuleron al la delegitoj kun teksto por enpresi en tagaj gazetoj. Tiu ĉi informo tradukita en 30 lingvojn aperis en centoj da tagaj gazetoj. Ĝi tekstis: »Ĉar la militago okazis preskaŭ subite, multaj personoj troviĝas surprizitaj en la malamikaj landoj kaj ne plu havas la eblon, korespondi kun siaj parencoj kaj amikoj. Por laŭeble helpi ilin, la oficejo de UEA, sidanta en Ĝenevo, ĵus informis siajn delegitojn en la malamikaj landoj, ke ĝi volonte servos kiel perilo por la interŝanĝado de privataj korespondantoj inter la malamikaj landoj. La leteroj estas ricevataj ĉe la Ĝeneva Oficejo, el kie ili estas transdonataj al la adresato, se bezone post traduko. Estas akceptataj nur la nefermitaj korespondantoj, havantaj absolute nenian politikan aŭ militistan karakteron. La personoj, kiuj deziras uzi tiun servon, nun en plena funkcio, estas petataj, sendi ĉiujn leterojn, kun du internaciaj respondokuponoj, al UEA, 10. rue de la Bourse, Genève, Svislando.« Dum sept. ĝis dec. 1914. la alveno de korespondantoj fariĝis timiga — pro la laboro, kiun postulis la plenumo. Jen la dispartigo laŭ fakoj: 1. simpla transsendo; 2. specialaj servoj; 3. mensendo; 4. militistoj; 5. civilkaptitoj; 6. rehejmitado de civiluloj en militregionoj; 7. militkaptitoj kaj rilatoj kun la respektivaj aŭtoritatoj; 8. rilatoj kun ruĝkrucaj organizaĵoj; 9. Ruĝa Kruco, Ĝenevo; 10. variaĵoj. Neforgesindaj estas la servoj, kiujn plenumis la delegitoj Pinagel, Alfred Mahn, Bernhard Luis, Charles Brunet, Schwaiger, F-ino Gérard, prof. Christaller, St. Rudnicki, Szabuniewicz kaj aro da aliaj.

Menciinda detalo en la historio de UEA estas la ĉikanoj. De 1916 la gazeto „E” estis malpermesita en Fran-

cujo kaj malgraŭ interveno de generalo Sébert ĉe ministro Painlevé tiu ĉi malpermeso ne estis forigata. La milita aŭtoritato, kiu decidis pri tio, bazis sin sur la prijuĝo de oficiro de cenzuro, fama E-isto, fariĝinta Idisto. (La gazeto havis tiam 300 abonantojn en Francujo.) Tre malutilis ankaŭ tio, ke la poŝto por transmaraj landoj pasis Francujon. La brita cenzuro tiurilate kondukis pli larĝanime. La germana cenzuro ne ekzamenis periodaĵojn, traŭrintajn Germanujon, sed nur korespondaĵojn.

La agado de UEA sur E-ista kampo estis tiu de ligilo inter la ankoraŭ funkciantaj organizaĵoj en kelkaj neŭtralaj landoj kaj la aktivaj E-istoj. Aperis regule „E“ ĉiumonate kun artikoloj pri tutmondaj problemoj. En 1916 aperis jarlibro, kiu enhavis ĉefajn informojn kaj la adresaron de delegitoj. Plie aperis dufoje libreto: »E dum la milito«, kiu enhavis resumon de la stato de la movado. Elokvente parolis pri la sekvoj de la milito la ciferoj. En 1914 la nombro de pagintaj anoj estis 7233, en 1915 estis 2699, en 1918 1958.

Je la 11-a nov. 1918 silentis la kanonoj. Unu post la aliaj alvenis leteroj de revenintaj soldatoj. Per Alvoko al la E-istaro (jan. 1919) subskribita de Hodler kaj E. Stettler, UEA anoncis la reprenon de la laboroj. La malsano de Hodler devigis ŝanĝon en la administra gvidado, kiun akceptis E. Stettler kaj dum marto ankaŭ la Centra Oficejo translokiĝis al Bern. La jaro 1919 estis plene dediĉita rekonstrui la asocion. Je la fino de la jaro UEA kalkulis 3114 anojn. La sumo de poŝtaj ricevitaĵoj kaj senditaĵoj atingis denove 20.000 kontraŭ 8.300 en 1918.

Du gravaj okazintaĵoj distingas la jaron 1920: la morto de la fondinto Hodler kaj la okazigo de l' unua postmilita UK en Hago. Monumenton Hodler ne bezonas, tion li kreis en UEA, en kiu li metis sian tutan koron, amon kaj inteligenton. Bela memorajaĵo, kiun li lasis, estis la donaco de kapitalo, kiu devis certigi la ekziston de UEA. Dum la UK la ĉefa laboro de la UEA-kunveno estis

la diskuto pri la statuto, kiu estis verkata de Stettler.

La UK en Helsinki en 1922 alportis gravan ŝanĝon: UEA fariĝis kolono de duflanka tutmonda organizaĵo E-ista. Per la kontrakto de Helsinki UEA fordonis certajn laborojn, kiujn ĝi ĝis tiam plenumis. La evoluo de UEA ĝis 1932 iris sian vojon, regule kaj decide. Ĝi ĉefe dediĉis sin al la firmigo de la propra organizaĵo, al la plibonigo de la servoj, al la plidensigo de la delegita reto kaj al la pligrandigo de la membraro.

La membraro de 1919 kreskis ĝis 1927, poste malkreskis.

1920 : 3894	1925 : 9424	1930 : 9062
1921 : 5579	1926 : 8687	1931 : 8835
1922 : 6253	1927 : 9100	1932 : 8619
1923 : 6332	1928 : 9095	
1924 : 8265	1929 : 9113	

La prezidanto de UEA estis la fondinto H. Hodler ĝis la morto 1920 Okupis tiun ĉi oficon ĝis sia malsaniĝo en 1924 E. Stettler. De tiam ĝis 1928 prezidis E. Privat, poste fariĝis denove prezidanto E. Stettler, kiu rezignis pri la ofico en 1934 kaj sekvis lin L. Bastien.

Multajn partojn de la historio de UEA v. en la artikoloj: Organizo, Milito Esperanto, Oficiala Jarlibro, Hodler, Privat, Stettler, ktp. Pri la nuna stato de la organizo l. la Jarlibron 1934, p: 6—16.

Detalan, kvankam ne kompletan historion de UEA enhavas „Historia skizo, 1908—1933, verkita de Georgo Agricola (Jarlibro 1933), kiu aperis ankaŭ en aparta represo. Nia artikolo estas kompilaĵo el la nomita skizo.

Ueda Hanji, japano, kuracisto. Nask. 15 sept. 1883 en Hukuoka-ken. E-isto de 1925. Fond. kaj prez. de Oomota EG, kaj tiea UEA-del. Konsilanto de Kiuŝu EL. — (Kuw.)

Ueda Koozoo, japano, prof. de farmacia kolegio de Nagasaki. Nask. 9 nov. 1900 en Hyogo-ken. Del. de UEA. Prez. de 22-a J E-Kongreso en N.

Ueno Takao, japano, komercisto. Nask. 18 febr. 1885 en Tôkyô. E-isto de 1922. Fondis E-fakon en sia firmo Kjokko-ŝa kaj multe importis E-

librojn ekde aŭg. 1923. Unu el la dir. de JEI. — (Kuw.)

UEPL: Universala E-ista Pacifista Ligo. v. Pacifismo.

UFE: Universala Federacio E-ista, v. Organizo.

UHA: Universala Homama Asocio. v. Oomoto.

Uhlmann (ulman) Fr., germano svisa, d-ro med. Verkis lernolibron, vortareon, trad. »Kulturceladoj de la nuntempo« de Forel, 1911. Kunlaboris al »E«, »Monda Poŝto«, »Int. Med. Revuo«, »Vespera Horo«.

Uitterdijk (ojterdejk) Drees, nederlandano, institutestro, poste korektisto. Nask. 25 febr. 1866 en Roodkerk. E-isto de 1898. L. K. de 1905. Pioniro de la E-movado en Nederlando. Verkis la unuan detalan lernolibron por nederlandanoj, kiu aperis 1 dec. 1901. Fondis en majo 1902 gazeton »Holanda Pioniro«, de li red. kaj adm., kiu vivis ĝis 1905. Verkis vortarojn kaj ekzercarojn, faris paroladojn, gvidis kursojn, verkis prop. artikolojn. Helpis al starigo de la NES. Oferinte por E en la unuaj jaroj sian tutan liberan tempon, sian energion kaj tutan ŝparmonon, post 1905 iom malpliaktivigis. Tamen li prizorgis ĝis 1923 recenzi rubrikon en restarigita »H. Pioniro«. En 1925—27 li redaktis »H. E-Pioniron« kaj »Wereldtaal«, partoprenis en nova organizo NEA, verkis novan lernolibron kaj trad. amuzan libron »Longkrurulo«.

UK: Universala Kongreso. v. Kongresoj.

Ulrich (ulrih) Franz, germano. Nask. 22 jan. 1897 en Bürgstein (iam en Aŭstrujo, nun en Ĉeĥosl.) E-isto de 1920. Gvidis multajn kursojn. Longjara sekr. kaj estro de »Nordbohema E-Distrikto«. Kunlaboris al diversaj gazetoj. Verkis: »Skizoj el E-ujo«, 1934.

Ungár Imre, hungaro, pianovirtuozo. Nask. en 1909. Gajnis la unuan premion de la Chopin-konkurso en Varsovio 1932. Grandsukeesaj koncertoj en multegaj landoj. Estas blindulo, E-n uzas praktike dum siaj eksterlandaj vojaĝoj.

Universala Esperantista Pacifista Ligo. v. Pacifismo.

Universala Esperanto-Asocio. v. UEA.

Universala Esperanto-Asocio: »Historia Skizo de 1908—1933« de Hans Jakob. 1933, 110 p. Grava historia superrigardo pri la plej grava institucio de E. Precipe interesa kaj detala estas la ĉapitro »UEA dum la milito«. La verkon kompletigas statistikaj tabeloj.

Universala Esperanto-Metodo. Verkita de W. Benson. 1932, 560 p., kun 11.000 bildoj. Grandioza instruverko por memlernantoj. La unua parto prezentas per rekta bildmetodo la gramatikon, vortojn kaj frazkonstruon. La dua parto konsistas el ampleksa krestomatio, la tria estas vortaro, en kiu la vortoj estas klarigataj per bildo, difino kaj granda parto de la vortoj en 40 naciaj lingvoj. La kvara parto enhavas listojn de samspecaj vortoj laŭ alfabeto aranĝo.

Universala Homama Asocio, v. Oomoto.

Universala Kongresoj, v. Kongresoj.

Universala Terminologio de la Arkitekturo. (Arkeologio, arto, konstruo kaj metio). De F. Azorin, 1933, 215 p. »La verko enhavas ĉ. 2000 fakvortojn kaj 2000 desegnojn, ĉiu radikovorto estas tradukita en 6—8 lingvojn. Do ĝi estas gravega gajno en nia fakvortara literaturo... La desegnoj ĝin faras kvazaŭ atlaso de la arthistorio... Sed lingvaj malkorektajtoj.« (y, Lingvo Libro, 1934, p. 12.)

Universala Vortaro de la lingvo internacia, eld. de Z en 1894. Varsovio, 52 p., 5-a eld. 1906, 96 p. Ĝi entenas krom la 900 vortoj de la »Unua Libro« 1740 novajn radikivortojn (kun tradukoj angla, germana, franca, rusa, kaj pola), troviĝantajn en la ĝis tiam aperintaj verkoj, artikoloj kaj tradukoj en E. Ĉiu gramatika finiĝo kaj afikso ludas en ĝi rolon de memstara vorto. En 1905 ĝi konsistigis la trian parton de la »Fundamento de E«, (v.), do ĝi fariĝis netuŝebla. M. SIDLOVSKAJA.

Universitatoj. E ankoraŭ ne havas profesoran katedron ĉe universitato. Lektoroj de E funkcias ĉe la universitatoj en Genève (Privat), kaj Li-

verpool (Collinson), ĉe la teknikaj altlernejoj en Praha (ĉe la germana Michal kaj ĉe la ĉeĥa Pitlik) kaj en Wien (Schamanek, poste Wollmann). E-movado inter univ. studentoj konstatablas ĉefe en Francujo kaj Japanujo. Detalojn legu pri la lektoraj katedroj en UEA-Jarlibro 1930, p:39.

Universo. v. La Bela Mondo.

Unuaj libroj de Konfuciana Biblio.

El la ĉina trad. Kiuĉi Nohara. 1932, 65 p. »La ĉefa enhavo estas konsiloj, instruoj, precipe — en la dua libro — al reganto de popoloj. Stilo tro seka.« (P. B., »Bibl. Gazeto«, 1933, p: 28.)

Unua Legolibro. De K a b e. Kvina eld. 1922, 160 p. »Anekdotoj, rakontoj, fragmentoj, frazlibroj kaj leteroj, kunigas distron kaj instruon. La mirinda stilo de l' verkinto ne bezonas plu rekomendon.« (G. S. 'E', 1923, p: 45.)

Unua Legolibro. Kompilis B a r t h e l m e s. SAT, 1932, 101 p. Enhavo: Anekdotoj, Pensigaj rakontoj, Paĝoj de l' rido, La lingvo kaj ĝia vivo, Priskriboj kaj La scienco kaj la instruoj. Lingvaj rimarkoj sub la leg-aĵoj.

Unua Libro de Esperanto estis lernolibro por rusoj. Laŭ tiutempa rusa lego ĉiu presita verko povis aperi en la librovendejoj nur tiam, kiam oni ricevis permeson de la cenzuro (krom ĝia antaŭa aprobo), t. n. »bileton por ellasi« ĝin el la presejo. Zakrzewski sukcesis trovi tiun »bileton« inter malnovaj paperoj de la presejo, kaj ĝi havas la daton: 14 jul. 1887, do ĝi estas la tago de la apero de la unua E-libro. La libro konsistas el 40 paĝoj, kovrilo kaj granda folio. Ĝia titolo: «Dr. Esperanto. Mejdunarodnyj Jazyk. Predislovie i polnij uĉebnik.» (Traduko: D-ro E Int. lingvo. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro.) Sur la titolpaĝo krom la titolo estis presite en E: »por Rusoj« kaj ruslingve: »Por ke lingvo estu tutmonda ne sufiĉas nomi ĝin tia.« »Prezo 15 kopekoj«, »Varsovio. Tipo-Litografajo de H. Kelter. Strato Novolipie n-ro 11. — 1887 —«. Sur la dua paĝo estas permeso de la cenzuro kun la dato: 21 majo 1887 kaj subskribo en la rusa lingvo: »La lingvo int., kiel

ĉiu nacia, estas komuna propraĵo; la aŭtoro forlasas por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn al ĝi.« Sur la tria paĝo de la kovrilo estas la ruslingva noto: »La rajto de traduko de tiu ĉi broŝuro en ĉiujn aliajn lingvojn apartenas al ĉiu.« Sur la lasta paĝo ruslingve kaj en E: »Adreso de la aŭtoro: Al s-ro D-ro L. Zamenhof por D-ro Esperanto en Varsovio. Ĉefa vendejo de tiu ĉi broŝuro (en rusa lingvo) en la librovendejo de V. A. Istomin en Varsovio.« Enhavo de la libro: 1. Antaŭparolo (28 p.), en kiu estis la unuaj E tekstoj: a. Patro Nia (preĝo), b. El Biblio, c. Modelo de letero, ĉ. Mia penso (originala poezio), d. traduko el Heine, e. Ho, mia kor' (originala poezio); 2. 8 kartetoj »promesoj« (v.) kun deklaro, enhavanta promesojn ellerni la lingvon, se dek milionoj da personoj donos publike la saman promeson; 3. plena lernolibro de la lingvo int., konsistanta el la alfabeto, dekseks gramatikaj kaj sintaksaj reguloj (6 p.) 4. Sur aparta folio estis aldonita E-rusa vortaro kun klarigoj pri ĝia uzo. (Antaŭparolo; I kaj II ĉapitroj represitaj en Fund. Krestomatio, p: 241—56. — Antaŭparolo kun klarigoj de Dietterle en OV, p: 17—21.) I. SIRJAEV.

»La ruslingva »Unua Libro« entenas kelkajn formojn, restojn de antaŭaj Z-aj provoj, kiuj malaperas en la franca, pola, ktp. Jen ili estas: speri (espero), vinki (venki). Aliaj radikoj havas sencon nun ne uzatan: erari (vagi), militi (batali), forko (fork-ego), sta'lo (ŝtalo), ŝtofo (materio, kemia principo), vaksi (kreski), tombi (fali). Vortoj ian, kian, nenian, ... en ĉiuj kvin naciaj »Unuaj Libroj« signifas iam, kiam, ... La ruslingva »Unua Libro« enhavas 947 radikojn, el kiuj 11 estas propraj nomoj. Sur la aldonita folio ni trovas 917 radikojn abcorditajn kaj 10 ekster la ordo. Preserara folieto donas ankoraŭ 2, sed nu'igas la radikon »sper«. En la teksto kaj titolpaĝo ni trovas ankoraŭ 19 radikojn. Entute 947.«

(STOJAN, BIL, p: 287.)

Unua adresaro: 1889 en Varsovio kun 1000 nomoj de E-istoj, inter kiuj estas Beaufront, Demonget, Dombrowski, Einstein, Frolo, Geoghegan,

Grabowski, Henriclundquist, Kana-
loššy-Lefler, Kofman, Marignoni, Phil-
lips, Runström, Schmidt, Solovjov,
Trompeter, Wahl, ktp.

— artikolo pri E: 7 aŭg. 1887 en
pola jurnalo »Kurjer Godzienny« en
Varsovio kun la titolo »Anti-Volapük«
subskribita de Wl. S. (Wladyslaw
Sabowski), en kiu la aŭtoro montris
superecon de E.

— diservo kun E-lingvaj kantoj: 26
okt. 1896 en la katolika preĝejo de
Smolensk (Rusujo).

— dramo originala: Gustaf Vasa de
R. Schmidt en 1910.

— ekzameno pri kapableco: 1899
de SPPE.

— Enciklopedio de Esperanto: la
nuna, 1934.

— filmo E-a: la entombigo de Z,
 prezentita 17 apr. 1917 en la varsovia
kinejo Uranja.

— gazeto: 1 sept. 1889 »La E-isto«
en Nürnberg. Ĝia eld. estis L. Ein-
stein, red. Z.

— geedziĝo inter diversnaciaj
pere de E: 1899 en Abo inter V.
Langlet kaj S. Blomberg.

— insigno E-ista estis fabrikata
1894 en Odesa.

— interparolo en E: 1887 en Var-
sovio inter Z kaj Grabowski.

— interparolo inter diversnacioj:
1889, kiam la rusa E-isto Postnikov
vizitis Francujon.

— interŝtata rekono de E: 1924
»klara lingvo« por la telegrafo, pro-
ponita de la Ligo de la Nacioj kaj
1925 akceptita de la Univ. Telegrafa
Unuiĝo.

— kanthoro: 1921 en Budapeŝto en
kadro de HESL.

— kongreso: 1-a UK 1905 en Bou-
logne sur Mer.

— kongreso de UEA: 1910 en Dres-
den.

— kongreso de SAT: 1921 en Praha.

— kongreso de IKUE: 1910 en Paris.

— korespondado internacia inter
infanoj: 1903, aranĝita de instruistoj
Cejka (Moravujo) kaj Ducommun
(Svisujo).

— kunveno internacia de E-istoj:
7-8 aŭg. 1904 en Calais kaj Dover.

— laborista int. E-Asocio: 1906 la
»Paco-Libereco«.

— lektoro de E ĉe atlernejo: 17

apr. 1917 Josef Schamanek ĉe Tek-
nika Atlernejo en Wien.

— lernolibro: jul. 1887 en Varsovio.

— listo de la »unua-ajoj«: en la
»Konversacia Gazeto«.

— literatura konkurso: 1896 en Pet-
rogrado.

— ministro, kiu parolis en E: 1911,
Conybeer, dum la 1-a Aŭstralia E-
Kongreso.

— monumento de Z: 1914 en Fran-
zensbad.

— oficiro, kiu havis permeson uzi
E-an distingilon: 1917 Carreira Sal-
danha, Portugalujo.

— opera prezentado: 1912 dum la
UK en Kraków; »Halka«.

— poemo originala: 1887 »Mia pen-
so« de Z.

— poŝtmarko kun E-a teksto: 1925
en Sovetio.

— poŝtstampo E-a 24 aŭg. 1913
dum la UK en Bern.

— prediko: 1906 en la 2-a UK en
Genève; pastro Rust.

— preĝlibro: 1893, de L. Beaufront.

— prozaĵo originala: 1897, rakonto
de M. Abesgus sub titolo »Marko
Kraljević«.

— romano originala: 1907, la »Kas-
telo de Prelongo« de Vallienne.

— senfadena telefonparolado: 3 apr.
1930 inter A. Couto Fernandez, Rio
de Janeiro kaj E. Houbart, Paris.

— societo E-ista: dec. 1888 en
Nürnberg.

— standardo: 1905 en Boulogne; ĝi
flirtis unue sur ŝipoj de Duchochois
en 1905.

— strato de Z: 1912 en Sabadell
(Hisp.).

— ŝtatestro, kiu diris sa'utvortojn
en E: 1929 Miklas, Aŭstrujo.

— ŝtato, kiu reprezentigis sin ĉe
E-a kongreso: 1907 Belgujo (UK en
Cambridge).

— tabulo honore je E-ista verk-
isto: 1933 Grabowski, Varsovio.

— teatra prezentado: 27 sept. 1896
en Smolensk (Rusujo); komedio
»Brandfaristo« de Tolstoj.

— teatra prezentado per profesiaj
aktoroj: 1908 dum la 4-a UK en
Dresden; »Ifigenio en Taŭrido« de
Goethe.

— telegramo, laŭ la akcepto de E
kiel klara lingvo: 1 nov. 1926 de Brita

EA al la Radio Ekspozicio en Dublin.
— tradukita verko: 1888 »La Neĝa
Blowado de Puŝkin, trad. de Gra-
bowski.

— vojaĝo per E: 1895; svedaj stu-
dentoj V. Langlet kaj Etzel at Rusujo.

Unuel, ps. de Z.

Unuigintaj Statoj de Eŭropo. v.
USE.

Unuigo de E-istaj Virinoj. v. UDEV.

Uppsala. Urbo en Svedujo kun 30,295
loĝantoj. Loko de la dua oficiala unu-
igo de E-istoj, 1891, kie fondiĝis la
grava gazeto »Lingvo Internacia«,
1895, kaj restis tie ĝis 1899.

Ura Ryozi, japano, asistanto de
anatomio ĉe Imp. Univ. de Tôkyô.
Nask. 11 apr. 1903 en Tôkyô. Landa
kasisto de TEKA en J-ujo. Multe
klopodas por E en medicinaj rondoj.

Urugvajo, Suda Ameriko. Pioniro
de E estis en 1901 Carlos Charrier.
Precipe multon li laboris por E en
1904-5. Dank' al lia fervoro, 24 sept.
1905 estis fondata la unua E-grupo,
poste al'ormiĝinta je societo. En 1906
la societo aranĝis kursojn en Liceo
Carnot kaj por propagandi E-n oni
fondis specialan Int. Grupon de Monte-
video. Samjare la gazeto »El Dia«,
presis portretojn de membroj de la
societo. Dum medicina kongreso en
la ĉefurbo (1907) Meksika delegito
prof. Gr. Mendiabál rekomendis E-n
por kongreslaboroj kaj dum samjare
okazinta Amerika Kongreso de Stu-
dentoj E-istaj studentoj de Monte-
video faris raporton pri E. Samjare
oni fondis en la urbo societon unu-
igantan la prop-istojn de du najbaraj
respublikoj Argentino kaj U., poste
(en 1911) tie oni fondis EA-n »Semo«.
En 1925 oni aranĝis Radio E-Kurson,
Fernandez gvidis kursojn por s-inoj
de la Ruĝa Kruco kaj por geinstru-
istoj, oni fondis UES-n kaj por jun-
uloj E Junularo-n. 1—4 jan. 1926 en
Montevideo okazis la 1-a Sudamerika
E-Kongreso, kiun partoprenis delegi-
toj de Ĉilo, Paragvajo, Brazilo,
Argentino kaj Urugvajo. Kelkan tempon
agadis Sudamerika E-Federacio, kiu
aperigis monatan revuon »Sudame-
riko«. Samjare fondiĝis ankaŭ U. Kat.
ES. En 1927 ĵurnalo »Impercia« ĉiu-
semajne publikis E-informojn de la
E-a Junularo. Laŭ la Dietterle-statis-

tiko en 1928 E-istoj troviĝis en 9 lo-
koj. Laŭ la raporto de IĈK en 1933
Enrique Munoz, spite al sia granda
aĝo, tre vigle sekvis ĝiajn laborojn.
UEA-del. en 1933 en 10 lokoj.

I. ŜIRJAEV.

Usmanov Samil, tataro, sovetiano,
verkisto. Nask. 1898. E-isto de 1929.
Membro de CK SEU de 1931. Gvidis
Moskvan komitaton de SEU 1930—32.

Usono (populara formo de landno-
mo Unuigintaj Statoj de Ameriko).
Usono kaj Kanado kune prezentas
grandan areon kun pli ol 130 mi-
lionarioj da loĝantoj, kie la angla lingvo
estas preskaŭ la sola parolata. Oni do
ne sentas la bezonon de helpa lingvo
tiel forte, kiel en aliaj landoj, kies
lingvoj ne havas egale grandan dis-
vastiĝon, kaj pro tio E ne estas tiel
multe akceptata, kiel en multaj aliaj
landoj. Ankaŭ la E-istoj de U. ne
povas ofte renkonti kaj viziti aliland-
ajn kaj alilingvajn E-istojn, kaj ne
povas ricevi praktikajn helpojn per
la uzado de E tiom, kiom ekz. la E-
istoj de eŭropaj landoj.

Tamen E-istoj troviĝis en U. de la
unuaj tagoj de la movado. En 1887
Amerika Filozofia Societo (v.) en
Philadelphia, post studado de Vola-
pük, kiun ili ne povis aprobi, propo-
nis al aliaj intelektaj societoj de la
mondo kongreson por krei int. ling-
von, laŭ principoj tute similaj al tiuj,
sur kiuj estas bazitaj E., pri kiu ili
tiam sciis nenion, sed pro manko de
respondoj, la proponita kongreso ne
efektiviĝis. Tamen Henry Phillips,
sekr. de la Societo, tradukis la unuan
lernolibron de Z. sub la titolo »An
Attempt Towards An International
Language, by Dr. Esperanto«, kaj
eldonis ĝin en 1889. Li ankaŭ propo-
nis verki vortaron, sed lia longa mal-
sano kaj morto (en 1895) malebl-
igis tion, kaj estis granda perdo rilate
al la progresigo de E en U. Nelonge
post la apero de E R. H. Geoghegan,
unu el la unuaj angleparolantaj E-istoj,
venis el Anglujo al U. kaj laboris di-
ligente por E. Li tradukis en anglan
lingvon la unuajn lernolibrojn de Z
kaj lia profunda scio de orientaj kaj
aliaj lingvoj estis utilaj en la propa-
gando de E ĉe la neeŭropaj popoloj.
En tiuj fruaj tagoj F. G. Morin en

Chicago kaj A. G. Beaman en Milwaukee, inter aliaj, estis pioniroj de la afero.

Dum multaj jaroj, tamen, la afero, kiel aliloke, kreskis tre malrapide. Nur izolaj fervoruloj laboris en la kampo. Nur en 1905 ĝi komencis antaŭeniri sur la vojo de sukceso. 16 febr. 1905 kelkaj interesatoj en Boston fondis la unuan grupon en U., kies prez. estis John Fogg Twombly, sekr. Edward K. Harvey. 23 marto 1905 la Bostonaj E-istoj fondis nacian asocion, Amerika E-ista Asocio, kies prez. fariĝis Charles A. Matchett, sekr. Harvey kaj Twombly. En tiu jaro aperis ankaŭ grupoj en New-York, Philadelphia kaj aliloke; en 1906 en Chicago, Seattle, kaj multaj aliaj lokoj. Tre konata usona ĵurnalisto, George B. M. Harvey, subtenis la movadon fervore, presante en grava gazeto »North American Review«, kiun li redaktis, propagandajn artikolojn kaj lecionojn kaj varbis al la afero multajn gravajn personojn. Laŭ raporto de ia sekr. de la nacia asocio, en jan. 1907 ekzistis en Usono kaj Kanado 82 konataj grupoj kaj rondoj. En jan. 1907 la asocio komencis eldoni gazeton »Amerika E-ista Revuo«. (Jam en okt. 1906 Arthur Baker en Oklahoma City estis fondinta gazeton »Amerika E-isto«.) En 1908 ĉe la unua landa kongreso en Chautauqua (ŝtato New York) oni renomis la asocion E-ista Asocio de Norda Ameriko (EANA) kaj Edwin C. Reed fariĝis sekr. kun sidejo en Chicago. Amerika E-ista Revuo ĉesis ekzisti kaj Amerika E-isto fariĝis oficiala organo de la asocio. En 1910 la 6-a UK okazis en Washington. 357 E-istoj ĉeestis, el 20 landoj, i. a. Z. 16 regnestroj estis oficiale reprezentataj. Prezidis John Barrett, direktoro ĝenerala de Panamerika Unuiĝo, kaj prez. de EANA. Oni prezentis en parko dramon de Shakespeare »Kiel Plaĉas al Vi«, trad. de d-ino Ivy Kellerman Reed.

Poste en Usono kiel en aliaj landoj, venis malfacilaj tagoj por la afero kaj la nombro de interesatoj malgrandiĝis. Pro la premo de personaj aferoj, Reed ne povis plu teni la direktadon de la asocio, kaj en 1913 kelkaj fer-

voraj E-istoj en ŝtato Massachusetts, i. a. Edward S. Payson, George W. Lee, Ernest F. Dow, d-ro C. H. Fessenden kaj f-ino E. J. Meriam, entreprenis la malfacilan taskon. Spite de ĉiuj malhelpoj la gazeto aperis regule kaj landa kongreso okazis ĉiujare. En 1915 okazis en San Francisco dum la Ekspozicio Panama-Pacifika la 11-a UK, organizita de D. E. Parrish, prezidis R. Colquhoun. Pro la milito tiam furiozanta nur 163 E-istoj ĉeestis, el 16 landoj; 17 regnestroj estis oficiale reprezentataj.

Post la milito la afero komencis antaŭeniri malrapide. En 1929 J. J. Süsmuth fariĝis sekr. de EANA kaj danke, ĉefe al liaj nelacigeblaj penoj la intereso pri E reviviĝis. Oni fondis novajn grupojn kaj ĝenerala intereso ree montriĝis pri la afero. En 1932 20 grupoj estas oficiale filiigitaj al la nacia asocio, kiu posedas 644 rekte aliĝintajn membrojn, krom multaj aliaj anoj de la filiaj kluboj. Neniu statistiko ekzistas por montri la nombron de la membroj de filiaj kluboj. Ekzistas ankaŭ ĉirkaŭ 40 aliaj grupoj ne oficiale filiigitaj al EANA, kvankam en harmoniaj rilatoj kun ĝi, krom diversaj neorganizitaj klasoj kaj rondoj. La asocio eldonas gazeton kaj jarlibron, vendas kaj eldonas librojn, kaj kondukas vigan propagandon. Sub ĝiaj aŭspicioj kunvenis landaj kongresoj seninterrompe de 1908. Prez. estas Henry W. Hetzel de Philadelphia (de 1926); sekr. J. J. Süsmuth de Fort Lee (New Jersey). La asocio reprezentas la E-istojn de Usono kaj Kanado kune.

Oficialaj aproboj de E de nacia kaj ŝtataj registaroj preskaŭ neniam estis farataj. La parlamento de ŝtato Maryland en 1908 faris leĝon permesantan la enkondukon de E en la lernejojn de tiu ŝtato; tamen ĝis nun oni ne uzis tiun permeson. En la pli multaj ceteraj ŝtatoj oni povas instrui E-n sen speciala leĝa permeso. E estas instruata en la ŝtataj universitatoj de Minneota (koresponde) kaj Kalifornia, p.ue en Univ. de Honolulu (Hawaii) kaj en superaj lernejoj de Honolulu kaj Los Angeles kaj Pasadena (Cal.). Krom tio la instruado estas tute farata de grupoj kaj privataj

klasoj. Diversaj ŝtatoj sendis oficialajn reprezentantojn al E kongresoj. Komerca Cambro de Los Angeles sendis D. E. Parrish en 1911 kaj Joseph R. Scherer en 1930 sur mondvojaĝon por reklami per paroladoj tiun urbon.

Laŭ 1932-a jarlibro UEA posedas 119 delegitojn kaj 15 vicdelegitojn en Usono. D. E. Parrish en Buffalo (ŝtato New York) estas nacia sekr. por Usono; B. Schmitz en urbo New York kaj A. S. Vinzent en San Francisco estas ĉefdelegitoj. Usonaj anoj de L. K. estas d-ino Ivy Kellerman Reed, Edwin C. Reed, d-ro James Underhill kaj Herbert M. Scott. Antaŭaj anoj estis R. H. Geoghegan, d-ro Max Talmey, d-ro D. O. S. Lowell, J. J. Süßmuth kaj W. G. Adams. Henry W. Hetzel estis reprezentanto de Norda Ameriko en K. R.

Usono ne donacis multon al la literaturo de E. D-ino Reed tradukis »Kiel Plaĉas al Vi« de Shakespeare kaj »La Reĝo de la Ora Rivero« de Ruskin. La ĉefa E-ista literaturisto en Usono estis Edward S. Payson, kiu verkis originalan romanon »Juneco kaj Amo« kaj tradukis multajn romanojn. D-ino Reed, d-ro Benson, A. Baker, Max Talmey, A. Kennigott kaj aliaj verkis lernolibrojn. El la ĉefverkoj de la usona literaturo aperis en E nur kelkaj kolektoj de romanoj de Poe kaj Irving, romano de Jack London, romano de Upton Sinclair kaj krom tio, malmultaj tradukaĵoj el la verkoj de malpli gravaj usonaj verkistoj. Kelkaj prop. gazetoj aperis, el kiuj ekzistas nuntempe nur »Amerika E-isto«, oficiala organo de EANA. Amerika E Instituto en Madison (Wisconsin) eldonas »Scienca Gazeton« (red. Karl Fröding).

Rimarko. La artikolon tralegis D. E. Parrish, E. C. Reed kaj J. J. Süßmuth, donis plenan helpon kaj konsilon f-ino E. J. Meriam.

W. G. ADAMS.

Laborista movado. LEA-NA (Laborista E-Asocio de Norda Ameriko) estas ankoraŭ en organizata stato. Ĉefa malhelpo: granda parto de LEA-anaro estas nova elemento nun spertiganta en la lingvo mem kaj

en organizaj problemoj. Membrostato en 1934 ĉ. 160. Grupetoj funkcias en New York, Cleveland, Chicago, Winnipeg, Toronto, Newark; la granda parto de la anaro estas izolitaj E-istoj en diversaj lokoj de Kanado, Usono, Kubo kaj Meksikio. Tre aktivaj anoj: R. Bonesper, Monus, Harwey, Germananton, Fridmann, Kardos, Gábor, Mario Villa, Schenker en New York City; Faltus en Cleveland; Vajner, Guderna en Chicago; Lazaruka en Montreal; Gumbinger en Toronto; Franyo kaj Grausdin en Winnipeg; Carlson en Vancouver, Marble en Seattle, ktp.

Biografio, alveninta post la presigo de la unua volumo:

Bonesper Ralph (ps. Ruĝamo), laboristo, eksmaristo. 37 jara (pro sengepatra vivado mankas detaloj pri la dato kaj loko de lia naskiĝo). Lernis E-n en 1921 en Hungarujo. Kiel migrulo kaj maristo vojaĝadis en ĉ. 20 landoj, helpite de E kaj propagandinte por E. En 1927 en Antwerpen organizis maristan E-grupon, kiu jaron post lia foriro likvidiĝis pro disvojaĝo de preskaŭ ĉiuj membroj. En 1929 prez. de SAT-Rondo en New York. En 1930 fondis LEA-NA, kaj gvidas ĝin ĝis nun (ĝen. sekr.). Instruis E-n en New Yorka »Workers School« (plej granda lab. revolucia lernejo en Ameriko), kiu oficiale enkondukis E-n. Peranto de IPE. Artikoloj en S-ulo, HDE, Ĉina E-isto k. a. Multaj artikoloj trad. el E en usonaj, francaj, germanaj, belgaj, sovetaj, ĉinaj kaj hungaraj gazetoj.

Usui Syuiti, japano, jurnalista de tagjurnalo »Yomiuri«. Aperigis en 1906 parolon de Kroita pri E en sia jurnalo kaj vekis intereson de publiko. Kunfond. de JEA, 1906. — (Kuw.)

USE (mallongigo de la nomo: Unuigintaj Ŝtatoj de Eŭropo). Paralele kun la Paneŭropa-movado (v.) estiĝis kaj evoluigis (longtempe ne publike) la USE-ideo kaj fariĝis la USE-programo. La ĉefdiferencoj inter la Paneŭropa- kaj USE-programo estas: a) La estonta mondpotenco dividiĝas — laŭ la Paneŭropa programo — je 5 partoj (USA, Britujo, Paneŭropo, Japanujo, USSR), dume tiu laŭ la USE-programo dividiĝas nur je 2

partoj: je la okcidenta hemisfero, gvidata jam nun de USA, kaj je la orienta hemisfero, gvidota de USE; b) al USE devos aparteni — laŭ diversaj geopolitikaj kaj sociaj kaŭzoj — ankaŭ Britujo kaj Rusujo; c) la Paneŭropa-movado, kiel oficiala helplingvo por la Paneŭropa-Unio, proponas la anglan, dume laŭ la USE-programo E estas destinita fariĝi la oficiala helplingvo en USE. Por forte kaj daŭre kunligi la eŭropajn ŝtatojn, la USE-programo proponas komunajn armeon, dogan- kaj eksterpolitikon kaj unuecan valuton. Taktiko: tondi por tuta Eŭropo ekonomipolitikan organizadon (USE-partion), kiu havas la taskon parlamentsisteme realigi la USE-programon. Laŭ la gvidantoj de USE la E-istoj estas destinitaj fariĝi la iniciatoroj kaj la ekigantoj de la USE-movado. Organo: USE-EĤO, Eldonejo: »Libro«, Timiŝoara I., Rumanujo. Fakliteraturo: Joset Zauner: »Der Weg zur Europa-Partei (Der Ausweg USE)«, (La vojo

al la Eŭropo-Partio, La elvojo USE); la sama: L' Eŭropanismo.«

Laŭ J. ZAUNER

USE-EĤO. Gazeto por propagandi inter E-istoj realigon de USE. (v.) Fondinto, eld. kaj red. Josef Zauner, Timiŝoara, Str. 1 Lonoviči, Rumanujo. Unua n-ro: jan. 1930. aperis 4 n-roj entute kun 24 paĝoj, formato 24×32 cm. De jan. 1931 ĝis jul. 1933 8 n-roj kun 32 paĝoj, 32×48 cm. Vigla redaktado, interesaj artikoloj kaj lertaj ilustraĵoj pri la eŭropa problemoj kaj por prop. de USE.

Utrechta Esperantisto. Gazeto aperinta monate, fondita de UER pro malapero de la nacia gazeto »Holanda E-isto«. La 1-a n-ro aperis 1 sept. 1925, la lasta (112-a) en jan. 1934. Presita komence hektografe, poste ciklostile. Kvankam kluborgano, UE estis sendata al la ĉefaj ned. E-istoj. Red. G. J. Degenkamp; adm. f-ino J. W. Woutersen, poste H. J. Korthals. — (G. J. D.)

V

Vagabonda Klubo, E-ista estis asocio de E-istaj pentristoj, literaturistoj kaj aliaj artistoj, fondita en Skotlando en 1906 de f-ino C. Oxenford. Post la eksplodo de la mond-milito ĝi ne plu funkciis. La »Ĉef-vagabondo« en 1914 estis J. M. Warden. Ĝia organo estis »La Vagabondo« (v).

Vagabondo kaj Sinjorino. Romano de W. Kloeppfer, trad. el la germana L. Goppel, 1931, 204 p. »Tute nuntempaj, postmilitaj aventuroj, eble ne tre kredeblaj, sed tre variaj, neatenditaj. Amuza distra legaĵo, korekta flua stilo.« (G. S., »E«, 1932, p:105.)

Vaghinak Sarkissian, pers. Mortis en 1931. E-isto de 1911. Multe prop-ia la lingvon en Tabriz, Teheran kaj Sultanabad.

Vaher Villem, estono, lernejestro. Nask. 21 jan. 1873 en Otepä. Aŭtoro de la unua E-lernolibro por estonoj (1893) kaj de konversacia lernolibro (1930) Prez. de EAE de 1922, dir. de EIE de 1925. Gvidis kursojn kaj de 1927 regule semajne paroladis en la radiostacio Tallinn en E.

Vahtkerl Johannes, estono, poŝtisto. Nask. 4 jan. 1886 en Raukla. E-igis 1908. Sekr. de la ES en Tartu 1914—15 kaj prez. 1915—16. Propagandas ĉefe sur poŝtista kampo. Multaj tradukoj el E en la estona gazetar, artikoloj en E-gazetoj. Trad. prizortan broŝuron el la estona.

Valkov D. D., ruso. Mortis 4 jun. 1910. Estis prez. de ES »Espero« en Peterburgo. Verkis ŝlosilon por rusoj.

Vallienne (valjen) Henri, franco, d-ro, kuracisto. Nask. 19 nov. 1834

en Saumur, mortis 1 dec. 1908 en Malakoff (apud Paris.) Estis, laŭ la atesto de Bourlet »alt-kreska, tortika, larĝsultra viro, kun sufiĉe longaj haroj kaj barbo, griznigraj, akrevidantaj okuloj, severa mieno. En tiu korpo de mezepoka kavaliro batis plej sentema kaj bona koro, en tiu kapo de kaperisto loĝis cerbo de altpensema scienculo.« — Kvankam kuracisto, V. multe interesiĝis pri literaturo; li estis jam publikiginta volumon da poemoj, en franca lingvo, (ĉe Dentu), kiam li ekkonis E-n en 1903. La literaturaj kvalitoj de E entuziasmigis lin, kaj tuj li ekuzis ĝin por tradukado de granda verko: »Eneido«, de Virgilio: ia du unuaj kantoj, laŭverse tradukitaj, aperis en 1904. Al la riproĉo, ke li pli bone farus propagandante la lingvon, li respondadis: »Certe antaŭ ĉio ni devas konigi la utilecon praktikan de E, sed ĝi nur tiam triumfos kaj venkos, kiam ĝi estos literatura!« Kaj pri tiu punkto, li plene konsentis kiel Z, kiu skribis en 1895. »Kiam la konstanta kreskado de nia literaturo iom post iom... malaperigos ĉiun dubon pri la vivipoveco de nia lingvo, tiam, volenevole... la registaroj devos aliĝi al ni.« En Aprilo 1905 kruela kormalsano atakis kaj preskaŭ mortigis lin; post la krizo, li ne plu povis eliri el sia ĉambro, nek forlasi sian apogseĝon. Sed tiun kompatindan situacion li profitis por akceli sian E-an laboron; en 1906, li publikigis la plenan tradukon de »Eneido«, en 1907 la originalan romanon »Kastelo de Prelongo«, en 1908 alian »Ĉu Li?« kaj samjare la tradukon de la novelo de Prévost »Manon«. Intertem-

pe, li redaktis prop. broŝuron en E kaj franca »Por kaj kontraŭ E«, li tradukis »Paco kaj Milito« de Richet kaj verkis eseon pri »Evolucio de la Religia Ideo«. Krome li kontribuis al »La Revuo«, »La E-isto«, »Scienca Revuo«, »Med. Revuo«, »Espero Katolika«, L. I., kie lastempe li aperigis longan artikolon pri »Eneo kaj la Romana Cerbeo«. Je sia morto, li lasis la tradukon de novelo de Musset »Margot«, publikigita kiel felietono en la »Franca E-isto« (1909) kaj la sekvantajn, ĝis nun nepublikigitajn tradukojn: »Kaprico« unuakta komedio, kaj »Oni neniam pri io devas juri«, triakta komedio, ambaŭ de Musset; »Aventuroj de Telemako« de Fenelon, kaj »La Metamorfozoj« de Ovidio, laŭverse tradukitaj. — Tiu agemo klarigas, ke, en 1908, ĉe la konkurso organizita de La Revuo: Kiu estas la plej bona esperantista stilisto?, li atingis la duan lokon, — malproksime — sed la unua post Kabe. — El tiu abunda produkto, kio restas? Ne tre multe. Ni devas konfesi, ke lia stilo havas nek la vervon, nek eĉ ĉiam la korektecon, kiuj konvenus al granda verkisto. Tia reprezentanto de la malnova burĝa klerulo, li bone scipovis la latinan kaj francan: sed lia nesciado pri la fremdaj lingvoj faligis lin tro ofte en francismojn neakcepteblajn. Lia traduko de Eneido estas misformita per malbona ritma sento: dum Kotman intermetis trokeojn meze de la daktiloj, V., por konservi la idealan skemon de la antikva heksametro, uzis nur daktilojn: sed li ne konsciis, ke pro la konstruo de nia lingvo, tiuj ŝajnaj daktiloj prezentas reale nur monotonan serion da 5 anapestoj — monstra verso, kia ekzistas en neniu lingvo. — V. estis la unua, kiu skribis originalajn romanojn en E: antaŭ li ekzistis ja kelkaj noveloj, sed dikaj verkoj da 450—500 paĝoj neniam estis ankoraŭ skribitaj. Verdire la enhavo de liaj romanoj ne estas tre altinspira. Ili apartenas al la plej malbona speco de l' felietona literaturo, kun krimoj, incendio, misteroj, nobelino senvirgigita (Kastelo de Prelongo), aŭ ident-konfuzoj pro ĝemela simileco, forkuroj, juĝista eraro, du-

obla kaj paradokse senkulpa adulto (Cu Li?) — ĉio plena je neatenditaĵoj, sena je la plej elementara psikologio, kaj tie an tie spicita de sensotikilaj aludoj. La sola neordinarajo estas la pecoj, kie la aŭtoro malkaŝas sian profesion per disertoj pri medicino. La stilo estas simpla, iom gazeta: evidentiĝas en tiuj libroj nesufiĉa elernado de la lingvo, supraĵa asimilo de la spirito de E. Malgravigas la kulpecon de V. la fakto, ke el la Z-aj tradukoj ekzistis nur Hamleto kaj la Fundamenta Krestomatio, kaj bonaj lingvaj studoj ankoraŭ mankis. Krome, kia ajn estas la valoro de la felietona literaturo, estis siatempe utila propagando montri, ke ankaŭ per tio E taŭgas; li efektive pruvis, ke la artefarita lingvo sufiĉas por esprimi ĉiujn ideojn kaj priskribi ĉiujn incidentojn de la ĉiutaga vivo — kaj havas sufiĉan logon por instigi la leganton ĝis la 500a paĝo. Tial, en la E-a literaturo, la verkaro de V. konservas, se ne artecan, almenaŭ historian valoron. G. WARINGHIEN.

Noto de M. C. Butler. Mi taksas la literaturan valoron de V. iom pli alte, ol G. W. Mi tre malmulte rimarkas ĉe li francismojn neakcepteblajn. Pli ol iu ajn alia verkinto en E li sukcesis verki librojn simplajn kaj interesajn, kvankam la temoj ne estas indaj je lia talento. La tradukon de Eneido mi trovis bonega.

Vanverts (vanver) Julien, franco, d-ro, kuracisto, prof. de la Univ. en Lille. Nask. 10 nov. 1870. Multaj verkoj pri ĥirurgio kaj ginekologio. Viceprez. de SFPE, eksprez. de TEKA. Kursoj kaj konferencoj pri E. Ĉefred. de »Int. Med. Revuo.«

Vaona Attilio, italo, advokato, prokuristo. Nask. 20 sept. 1880 en Zevio (Verona). Ampleksa socia kaj kultura agado: konsilanto kaj deputita membro de la komunumo Zevio ktp. E-isto de 1911, kiam kunfondis E Asocion en Verona. Prez. de l' komitato de la tria nacia kongreso. Prez. de IEF en 1922—24. Kunorganizinto de la komerca konferenco en Venezia, 1923. Delegito ĉe la Geneva Konferenco por la enkonduko de E en lernejoj. Multaj kursoj kaj paroladoj en diversaj italaj urb-

oj. Verkis prop. broŝuron kaj artikolojn.

Varankin Vladimir, ruso, docento de la okcidenteuropa historio, dir. de Moskva Ped. Instituto por fremdaj lingvoj. Nask. 12 nov. 1902 en N. Novgorod (nun Gorkij). E-isto de 1919. Prez. de la lab. ES en N. N. 1920—21, membro de CK SEU de 1921. Partoprenis la 19-an UK. Ano de Lingva Komisiono de SEU. L. K. de 1929. Ĉefred. de la »Ruĝa E-isto«, 1920—21. Aŭtoro de »Teorio de E«, 1929. Kunaŭtoro de lernolibro, 1930. Verkis originalan romanon »Metropoliteno«, 1933, 200 p.

Varnomoj. »Taŭga fabrikmarko, nomo por iu artiklo aŭ varo, influas notinde la disvastigon kaj aĉeton. Ne malofte la nomo de tia varo anstataŭas la nomon de l' objekto mem... La nuna tempo impresplena kaj plena je sensacioj ankaŭ kaŭzis la multe pli grandan zorgon por elekto de impresa varnomo... Estas fakto, ke E povus liveri multajn tre trafajn vortojn por tiaj varnomoj. La simplaco de la lingvokonstruo permesas tujan komprenon de amaso da vortoj, eĉ ne lerninte la lingvon. Tion jam ekkonis spertaj reklamistoj, E-istoj aŭ ne, kaj uzis tiun eblecon... Tre ofte estas uzataj la vortoj »Espero«, »Esperanto«... Pli gravaj estas la nomoj simple elektitaj el E pro belsoneco aŭ praktiko.« Jen kelkaj ekzemploj: Alpa, Alta, Arda, Belsona, Blanka, Briko, Eterna, Forta, Mirinda, Mortis. (Laŭ la artikolo en UEA-Jarlibro 1931, p:57—60.)

Varsovio. v. Warszawa.

Vasta Franz, aŭstro-germano, ofiisto. Nask. 6 aŭg. 1894 en Wien. E-isto fariĝis en rusa militkaptiteco en 1919. Bibl. 1924—27, kaj de tiam sekr. de »Danubio« Wien. Multe varbadis ankaŭ per lumbild- kaj aliaj paroladoj.

Vaughan (von) Rupert Falkland, (ps. »M. I. K.«; Verdavalo), brito, metalurgiisto. Nask. 5 jul. 1878 en Singapore, Malajaj Kolonioj. E-isto de 1905. Fondis unu el la unuaj E-grupoj en Hindujo en Kolar, 1906, kaj tie fondis kaj red. La Pioniro ĝis sia foriro el H. en 1907. Del. de UEA en Totok (Celebes), Tokyo, Osaka,

kaj nun en Sandakan, Norda Borneo. Artikoloj kaj rakontoj pri orientaj landoj aperis en HDE.

Vegetarano. Jam de 1908 la »Unuiĝo de E-istaj Vegetaranoj« eldonis specialajn cirkulerojn, kiuj fine fariĝis V., eld. de O. Bünemann en Milano. Pro la mond milito povis nur ankoraŭ aperi 1-a n-ro de sept-nov. 1914 en Milano kaj oni transdonis la red. al f-ino van Rees en Utrecht. De okt. 1920 O. B. — tiam en Hamburg — reprenis la red. kaj eld. Ĝi regule aperis ĝis 1925 kaj en 1926 (IXa jaro) estis enpresata en »Libero« (Sofia). De jan. 1927 — apr. 1933 O. B. denove prenis sur sin la eld. kaj poste donis ĝin al Jonescu Capatana en Bucuresti, 4-8 p. 29×23.

P. TARNOW.

Vegetarismo. Jam de la komenco de la E movado partoprenadis en ĝi multaj vegetaranoj, ankaŭ grafo Leo Tolstoj, kiu donis fortan moralan subtenon al E, estis fervora vegetarano laŭ etikaj principoj »La Fundamenta Krestomatio« enhavas du impresajn artikolojn pri V, el kiuj »La Hejmo de la Metiisto« estas tre konata. — Dum la UK en Dresden, 16 aŭg. 1908, laŭ iniciato de René Ladevèze el Agen (mort. en 1913), estis fondata Int. Unuiĝo de E-istaj Vegetaranoj, kiu kelkajn jarojn poste plisimpligis sian nomon al Vegetara Ligo E-ista (VLE). Tolstoj, per speciala skriba konfirmo, akceptis ĝian hon. prez.-econ. Administranto kaj animo de VLE estis Ladevèze, tiutempe en Hamburg. La ligo eldonis flugfoliojn en E pri V kaj en tri naciaj lingvoj pri E. Oskar Bünemann en jul. 1914 ekeldonis modestan dumonatan bultenon »Vegetarano« kiel ligilon inter la membroj kaj prop-ilon inter E-istoj por V, inter vegetaranoj por E. Tiutempe Rudolf Rajczy en Budapeŝto estis kasisto kaj J. A. Gill en Tunbridge, Anglujo, sekr. de la ligo. Jam dum la 4-a Int. Vegetarana Kongreso en Hago, 1910, E ludis gravan rolon. Kelkaj parolis E-e, i. a. Gill (La du verdaj aferoj) kaj s-ino Van der Vet-Dirksen (Kio devas aparteni al la tuta homaro). Pro la milito la redaktanto en Milano devis transdoni en majo 1915a sian laboron al f-ino

María van Rees en Utrecht, kiu kondukis la aferojn ĝis fino de 1916. Tiam la ligo ĉesis funkcii. En 1920, dum la UK en Hago, V. ludis gravan rolon, multaj el la kongresanoj, i. a. ges-roj Isbrücker, sidis ĉe la vegetara sekcio de la tablo. VLE havis fakkunsidon kaj decidis la pluan eldonon de la bulteno. Post cirkulero dissendita antaŭ la kongreso, aperis en okt. 1920 sub red. de Büne-mann, kun gvida artikolo de la liga prez., J. W. Sevenhuijsen (mort. 10 febr. 1923), la unua postmilita n-ro de la »Vegetarano«, kiu nun aperas en sia 16a jarkolekto. La enhavo rilatas ne nur al V, sed al la tuta viv-reformo kaj al la radikala pacifismo. De 1927 ĝis 1932 la gazeto samtempe estis oficiala organo de la ne-E-ista asocio Int. Vegetara Unio, kiu ĉesigis tiun arangon pro financaj motivoj. De okt. 1921a ĝis fino de 1926 ĝi enhavis specialan fakon »Movado por ĉasta vivo«, sub. red. de Daniel Roskes, Hago. Dum 1926 la bulteno aperis en la kadro de la revuo »Libero« presita en Sofia, sed tiu arango ne estis kontentiga. La administradon de la ligo kaj ĝia organo prizorgas Ion Ionescu Kapatzana, en Bucuresti, Rumanujo, kaj lin helpas landaj sekr-oj. Kelkaj el ili, kiel s-inoj Noll, Dresen, Royer, Blaise kaj Roskes-Dirksen ktp., jam de multaj jaroj laboradas por VLE, kies celoj estas: disvastigi E-n inter vegetaranoj kaj V-on inter E-istoj, antaŭenpuŝi la int. solidarecan vegetaran movadon.

OSKAR BÜNEMANN.

Vejtcler A. L., ruso, d-ro. Mortis en 1913. E-isto de 1895. Estis fervora prop-isto en Rostov sur Don, del. de UEA kaj prez. de Rostova Filio de Ruslanda LE. Trifoje penis malfermi en la urbo memstaran ES-n, sed la loka guberniestro ne permesis tion. Tradukis el Bunin, Dostojevskij, Gogol, Korolenko k. a.

Velnjč T. kroato, d-ro, monako en Dubrovnik. Verkis en 1924 prop. broŝuron.

Velten (felten) Michael, germano, rektoro de popollernejo en Essen. Nask. 18 jan. 1841 en Elberfeld, mortis 19 jul. 1928 en Dresden-Laubegast. E-istiĝis antaŭ la kvadra UK kaj

vig'le laboris. Verkoj: »Elementa lernolibro de E«; »Kompleta gramatiko«; »Tabelo-vortoj de Z«; »Leksikono de germanaj parolturnoj«.

Venezuelo, Suda Ameriko. Pioniro estis George O. Messerl en Poralamar, kie en 1904 estis fondata EG »Progreso«. En 1906 gazeto de Caracas »El Dominical« havis E-fakon, red. de li. En 1910 en San Cristobal aperis gazeto »Anda Lumo«. Laŭ la Dietterle-statistiko en 1928 E-istoj estis en 3 lokoj, UEA-del. en 1933 estis en Caracas. I. SIRJAEV.

Verax (veraks) Charles. (ps. Karlo Verks), franco, fotografisto. Nask. 28 febr. 1873 en Paris. E-iĝis en 1902. Per longa kunlaborado en Int. Scienca Revuo li akiris kompetentecon pri teknika terminaro, kaj fariĝis specialisto en tiu afero. Fondis kaj redaktis »Foto-revuo« (1906—1909). Fondis »Scienca Gazeto« (1912—1914). Verkis: »Elementa Fotografa Optiko«, 1906. »Vocabulaire français-E des termes... en photographie«, 1907. »Vocabulaire technique et technologique français-E«, 1908. »Enciklopedia Vortareto E-a kun franca traduko kaj difinoj en E« 1910. (Tiuĵ da »vortaretoj« fakte estas gravaj kaj fundamentaj verkoj por studo de teknikaj vortoj). L. K. de 1909. Dir. de la Komisiono por teknika lingvo 1911.

Verbigo Senpera. Karakteriza eco de l' E-a vortfarado; ĝi igas superflua specialajn verbigajn sufiksojn.

La senco de l' formita senpera verbo estas:

1. ĉe substantivoj signifantaj il o n : agi per ... ; ekz. marteli: agi per marte'lo. Kelkfoje: funkcii kiel... ; ekz. la koro martelis;

2. Ĉe substantivoj signifantaj p e r s o n o n : funkcii kiel... ekz. reĝi, gasti, tajlori;

3. ĉe substantivoj signifantaj m a t e r i a l o n : provizi per... ekz. arĝenti, ori, sukero, olei. En ĉi tiu senco oni uzas ankaŭ u m : aerumi, ventumi, kaj jen la teknika lingvo la sufikson iz: najlizi, ŝtonizi;

4. ĉe kelkaj substantivoj: fari agon karakterizatan per... ; ekz. ondi, ŝaŭmi, ordi;

5. ĉe prepozicioj esti... ; ekz. ĉirkaŭi: esti ĉirkaŭ...

6. ĉe adjektivoj: esti-a, impresi -e; ekz. nigri, blanki, similaj, egali, avari, pravi, utili, rapidi, furiozi, eblaj, indi, sani, inklini. En la pĉezio pli kaj pli vastiĝas la uzo de tiaj adjektivo-verboj; ekz. sobri, prudenti, honesti, juni, preti, pali, modesti, forti, alii (Grabowski), certi, malboni, antikvi, delikati ktp. Kiel lasta konsekvenco de ĉi tiu verbiga operas en la pĉezio ankaŭ la verbigado de participoj ekz. ĉe Grabowski: laŭdita, nomatis, malpermesitas, ĉe aliaj: vidintus, naskitus ktp. Z provizore malkonsilis ĉi tiujn formojn, dirante, ke ili estus ĝustaj nur, se la finaĵo a s havus la sendon de estas, kiun ĝi ankoraŭ ne havas, sed verŝajne iam havos. Nu, tiu ĉi profetaĵo realiĝis kiel montras la supra serio de adjektivo-verboj, en kiuj a s signifas est a s. Sed aliflanke oni devas akcenti, ke la participo-verboj, pro sia troa koncizeco, iom malfaciligas la komprenon, do oni devas nepre ŝpari pri ilia uzo kaj ĝin rezervi por la poezio. KALOCSAY.

Verboj transiraj kaj netransiraj. En E la transira uzebleco de la verboj estas pli larĝa ol en la naciaj lingvoj ĝenerale. Ekz: la verboj *sidi*, *kuŝi*, *iri* ktp. estas uzeblaj transire (mi *sidas* seĝon, li *kuŝas* litojn, ni *iris* longan vojon). Tamen, kelkaj verboj estas uzataj nur netransire, precipe la verboj kun *-iĝi*, ĉe kiuj oni evitas ĉe la akuzativon uzatan anstataŭ prepozicio; oni neniam diras: mi *kutimiĝis* ion, mi *sciigiĝis* ion, kvankam oni povas diri: mi *ekkutimis* ion, mi *eksciis* ion. Aliflanke, la transiraj verboj estas uzeblaj nur transire (komenci, fini, turni, ŝanĝi ktp.): la netransira formo de ĉi tiuj estas farata kun *-iĝi* (komenciĝi, finiĝi, turniĝi, ŝanĝiĝi ktp.). Kompreneble la komplemento de la transiraj verboj povas esti nur subkomprenata; ekz.: ni komencu; kial vi ne skribas? li ne scias legi. KALOCSAY.

Verbotempoj de dependaj propozicioj. En la propozicioj subjektaj, objektaj, predikativaj, epitetaj, se ili estas eksplikaj (t. e. enkondukitaj per KE), la verbotempoj estas relativaj, t. e. la estanta tempo de la subprop-o respondas al la tempo de

la ĉefprop-o, la estinta tempo signas antaŭtempcon, la estonta tempo posttempcon rilate al ĝi. Ekzemple: Mi vidis, ke li falas (estas falanta). Mi vidis ke li falis (estas falinta). Mi vidis, ke li falos (estas falonta). Same estas en la dependaj demandoj: Mi ne sciis, kie li estas (en la tempo de mia nescio).

En la subpropro-oj rilataj (enkondukitaj per relativaj: KIU, KIO, KIA) la tempoj estas absolutaj, t. e. ili montras, sen rilato al la ĉefprop-a tempo, tiun tempon, kiam la subprop-a ago okazas. Same estas en la adjektaj subprop-oj, se ilin enkondukas relativo, aŭ speciala konjunkcio: Li ĉeestis, kiam ŝi mortis. Mi ne renkontis tiun, kiu alportis la leteron. Mi faris, kion mi povis.

La diferencon inter la du kazoj lumigu la jenaj ekzemploj: Kiam mi venis (absoluta tempo) en la ĉambrojn, mi vidis, ke li skribas (relativa tempo). Kiam vi demandis (abs. tempo) min, mi ne sciis, kiam mi estos (rel. tempo) preta. KALOCSAY.

Verbotempoj Kompleksaj (malsimplaj, kunmetitaj). Ili formiĝas per la kunmeto de la aktivaj kaj pasivaj participoj kun la helpverbo esti. La pasivaj verboformoj estas formeblaj nur komplekse, la aktivaj VK servas por la pli preciza marko de la tempo. Sed ilia ofta uzo tropezigas la stilon; Kabe, la plej bona klasika stilisto ĉiam evitis ilin. Ĉi tiu evito estas ebla per la vortetoj *nun*, *jam*, *tuj*, antaŭe, per la sufikso *ad*, per la konjunkcioj *antaŭ ol*, *post ol* (post kiam). Ekz. Mi skribadis (estis skribanta) la leteron, kiam li envenis. Li jam foriris (estis foririnta), kiam mi alvenis. Antaŭ ol li mortis (kiam li estis mortonta), li faris testamenton. Post ol (kiam) mi finis (estos fininta) mian taskon, mi iros promeni. v. Pasivaj participoj, Pluskvamperfekto, Sintakso. KALOCSAY.

Verdaj Donkiĥotoj. De Baghy, 1933, 221 p. »La tre simpatia aŭtoro rakontas sur 174 paĝoj fragmenton el la vivo de Paŭlo Pál, kiu havis bonŝancon fariĝi el kutima terlaboristo — ulo de altaj sopiroj, laboranto por ideo. Specialan atenton meritas

la alia parto de l' verko, prezentanta karikaturojn de la »rondo familia«. Ili majstre fotografas la vivon.« (T. H., Pola E-isto, 1933, p: 171.)

Verda Karto. Socio post 50 jaroj. Eisaburo, Isihara, el la japana trad. JamanaKa. 1932, 184 p. »Imitajo de l' samtendencaj eŭropaj romanoj, sed kun esprimiloj multe pli modestaj. La traduko ne estas malbona.« (Totsche, L. M. 1932, p: 96.)

Verda Kato. v. Francujo (p: 155).

Verda Parnaso. Poemoj de I. U. 1932, 126 p. Unua parto: penetraj observoj, doloraj krioj, kaj akraj satiroj, elŝprucintaj el la koro de l' revoluciema junulo vestitaj per sonorantaj rimoj. Dua parto: tradukoj de poemoj el la japana kaj ĉina lingvoj de diversaj epokoj. Stilo ĝenerale bona. MATUBA-K.

Verda stelo. v. Insigno.

Verdkata Testamento. Originala poemaro de R. Schwartz, 1926, 126 p. »Kia lerteco en la versarado, kia jonglado kun la vortoj, kiaj neatenditaj vortludoj! Ĉu mokataj estas abstinenco, ĉu virino, ĉu aliaj aktualajoj, ĉiam en perfektaj versoj senmanke ritmitaj kaj rimitaj, la aŭtoro ĉizis senĝene siajn juveletojn.« (G. S., 'E', 1926, p: 136.)

Vermandere Gustave Charles, belgo, negocisto. Nask. 5 sept. 1892 en Gent. E-isto de 1911, helpsekr. de la EG en Gent ĝis 1914. Transloĝiĝis al Antwerpen en 1921, tiea UEA-del. de 1924. Sekr. de la A-a Komitato por Int. Komerca Lingvo. Sin okupas pri regula dissendo de E-e redaktitaj prospektoj, reklamiloj, prezaroj, katalogoj, gvidfolioj, ĵurnaloj, ktp. al laŭfakte elektitaj belgaj E-istoj. Kunfond. de BEI kaj ĝia adm. Komitato de la EG »Verda Stelo«, de 1924.

Vermuyten Hector, belglاندano, urba oficisto. Nask. 1 okt. 1889 en Antwerpen. E-isto de 1922. Kursgvidanto. Deklamisto, premiita de la »Reĝa Flandra Konservatorio«, kaj uzas sian arton en la servo por E kaj por diskonigo de la flandra literaturo. Kompilis kaj grandparte tradukis la flandran parton de la »Belga Antologio«, 1928, kaj verkis por ĝi historion de la flandra literaturo.

Versaĵoj. Originale verkitaj de G.

Deŝkin. 1912, 35 p. »Poezia animo, poeta kapableco; sinceraj sentoj kun lerta esprimo.« (Robo, La Verda Standardo, 1912, p: 93.)

Versteeg-Grafdijk Willy, nederlandano. Nask. 6 jul. 1886 en Giensendam. E-isto de 1926. Kursoj, ankaŭ en popollernejo. UEA-del. Trad. al E la detektivan romanon »La viro el Francujo« de Ivans, 1933.

Vijver Pierre Charles Marie, nederlandano. Nask. 3 okt. 1905 en Axel. E-isto de 1926. Prez. de sekcio de N. K., membro de la ekzamena komitato. Gvidis multajn kursojn en Eindhoven kaj apudaj urboj; tiujn en E partoprenas 100—130 kursanoj. Instruo laŭ propra lernolibro, kiu plene atentis la nacilingvan gramatikon.

Vikár Béla, hungaro, membro de la H. Scienca Akademio, pens. estro de la parlamenta stenograficejo. Nask. 1859 en Hetes. Tradukinte al hungara la georgian eposon »La leopardfela kavaliro«, li sukcesis fari tion nur per la E-lingva interpreto de Ciklari. Kiel ĉefsekr. de »La Fontaine Literatara Societo«, li dufoje kunaranĝis E literaturan matineon.

Viktimoj. Romano, originale de J. Baghy. 1925, 162 p.; dua eld. 1930, 240 p. »En la romano temas pri la martira vivo kaj superhoma sufero de la siberiaj militkaptitoj, pri la viktimoj de la mondoskua granda kataklismo. Ilian vivon priskribas la aŭtoro kun granda realeco, li mem ja estis ankaŭ ilia samsortano. Ĝia stilo estas modela kaj tute klasika.« (Halka, L. M. 1931, p: 15.)

Viktorov-Cefoviĉ Demetrio, ruso, pedagogo, E lektoro. Nask. 17 majo 1888. E-isto de 1925. Gvidis multajn E-rondetojn kaj kursojn. Vasta prop. laboro, ekspozicioj per materialo el 43 landoj. En 1932 organizis »Naĝantan Teatron«, uzintan E-n. La teatro veturis sur speciala vaporŝipo laŭ Dnepro kaj aliaj riveroj de Ukrainio kaj Blankrusujo kaj donis spektaklojn en la libera aĉro. Programo: teatraj verketoj kaj apartaj numeroj dediĉitaj al la int. ideo. Antaŭ la prezentadoj la fondinto faris prop. paroladojn pri E.

Vila Francisko, hispano, tervojisto. Nask. 29 sept. 1894 en Barcelona.

Verkis en hispana kaj kataluna lingvo teatraĵojn, poemojn ktp. Fond. EG »Juneco« en B. Dir. de Verda Stelo. Prop. laboro per artikoloj, radio, organizado de E-aj festoj. Gvidis multajn kursojn. Trad. al E poemojn; kelkaj originalaj poemoj.

Villaneuva Antonio Lopez, hispano, instr. en pensio. Nask. en 1857 en Molina del Segura. E-isto de 1902, dank' al la amikeco kun Codorniu, ankaŭ loĝanta en Murcia. Verkis diversajn gramatikojn kaj vortarojn (la unuan en 1902), precipe kunlabore kun Inglada. Kunlaboris al »Tra la Mondo«, »La Revuo«, »Juna E-isto«, L. K.

Villareal Frederiko, peruano, d-ro, prof. de astronomio ĉe la Fakultato Scienca en Lima, redaktoro. Estis pioniro de E en Peruo kaj en Sudameriko ĝenerale. Altirita al E per artikoloj de Méray (Francujo) li tuj (1901) fariĝis adepto de E. Verkis du lernolibrojn por hispanoj (1901, 1902), eldonis hispanlingvan tradukon de la »Ekzercaro«. 16 jun. 1903 fondis ES-n en Peruo kaj komencis eldonadi E-H-lingvan gazeton »Antaŭen E-istoj«. Multaj artikoloj. S.

Vink Jan Hendrik, nederlandano, kontoristo. Nask. 9 okt. 1897 en Enschede. Kelkajn jarojn sekr. de la haga sekcio de LEEN. Prez. de LEEN. Eldonis la libreton »E-a Kantokolekto« kaj trad. kelkajn el la kantoj. Eld. il. poŝtkartojn »La Holanda Muelilo« kun E-a teksto. Artikoloj en HDE, ktp.

Vinzent Andrew Snider, usonano, advokato, bankisto. E-isto de 1913. Kas. de UK en San Francisco 1915. Dumviva membro de UEA. UEA-def. de 1919 kaj ĉefdel. de 1921. Prez. de EA de California. Artikolo pri »La Antikva Maja Civilizacio de Centra Ameriko« en »E«, 1925, okt.

Virinaj nomoj. Laŭ K. Kalocsay (1. Lingvo Stilo Formo, p: 81—83) »la virinaj nomoj apartenas al tiu ĝena flanko de la lingvo, kiu ne estas kontentige solvebla per la propraj reguloj kaj sufiksoj de la lingvo.« Kaŭzas malfacilojn precipe la fakto, ke multaj virinaj nomoj havas konforman virnomon. Meazzini proponas la sufikson »io«: Emilo — Emilio, sed

ĉe multaj nomoj tio ne donas kontentigan solvon. (Julio, Paŭlio). Ĉe Z estas legeblaj: Johano, Ludovikino, do estas uzata la sufikso »in«. Sed tiel fariĝus tiaj nomoj: Antonino, Mariuno. Sed jam Z uzis la vorton Marta — kaj laŭ tio Kalocsay proponas, ke ĉiu virina nomo finiĝu je »a«: Julia, Paŭla, Roza ktp. Kaj por esti laŭfuncamenta, Kalocsay insistas tiel: »Ĉiu virina nomo estas rigardata, kiel adjektivo, rilatanta al la (ellasita) vorto »ino«: Jozefa (ino), Marta (ino). Tiu ĉi propono ankoraŭ ne estas oficiale akceptita.

Noto de M. C. Butler. La fatala kontraŭaĵo estas, ke oni ne povas adjektivigi la nomojn kun — a. Ĉu la Johanaa mano?!

Vivo de Jesuo. De E. Renan, el la franca trad. E. Gasse. 1907, 182 p. La supersignoj anstataŭigitaj per h. »Bona, fidela traduko de famega verko!« (Th. C., L.I. 1907, p: 569.)

Vivo de S. Francisko el Assisi. Biografio de la fama katolika sanktulo, originale de Carolfi, 1923, 64 p. »Klara, bonstila, kaj eĉ ofte poezia.« (P., »E«, 1924, p: 10.)

Vivo de Zamenhof. De Privat, 1920, 208 p., dua eld. 1923, 109 p. Titoloj de la ĉapitroj: La genoj en Litva lando; Infano en Bjalistok; Gimnaziano en Varsovio; Studentaj jaroj; Doktoro E; Idealista profeto; Homarano; Kongresaj paroladoj; Lingvisto; Verkisto; Etika pensulo; Homo ĉe morto. »La Majstro, jam mortinta, kun spirito vivanta estas inter ni kaj por funde koni ĉi-tiun animon, la plej homan en la lasta jarcento, la disĉiplo fidela prezentas ĝin al ni per majstra elokventeco en sia verko.« (Jobo, L. M. 1922, p: 20.) Aperis en angla (1931) kaj nederlanda (1934) tradukoj.

Vöcdono en 1894. v. Reformprojekto de Z. en 1894.

Vogt (fogt) Anton, germano, d-ro, bankisto. Nask. 13 jun. 1882 en Aschhausen. Volapükisto, 1897. E-isto de 1903; ano de la EG Berlin, 1907. Prop. paroladoj en Norda Bavarujo, 1909; grupfondo en Würzburg kaj Schweinfurt. Ano de EG Bamberg, 1912. Ano de EG Augsburg 1917. Reorganizo de la Bavara E-Ligo. Ano

de EG Stuttgart 1920. Fariĝis estrarano de GEA. Reprezentis germanajn komercajn ĉambrojn dum la E-konferencoj en Venezia kaj Paris. Partoprenis multajn UK-jn. Unu el la gvidantoj de la reorganiza laboro: plano por la unuecigo 1928, poste longa batalo, prez. de la unuecigaj pritraktadoj kun fina sukceso, 1933. Verkis multajn artikolojn, prelegis dum la Someraj Univ-oj en Danzig kaj Köln pri ekonomiaj problemoj.

Vojaĝo en Faremidon. Du ŝipoj. Du noveloj de Karinthy, el la hungara trad. Totsche. 1934, 83 p. La »Vojaĝo« estas kvazaŭ daŭrigo de la romano Gulliver de Swift. Bona traduko.

Vojaĝoj kaj Aventuroj de Sinjoro Longkrurulo. Rime verkita de Uitterdijk. 1927, 80 p. (152 bildoj kaj 162 strofoj.) »Bonega infanalbumo, kiu elvekos laŭtan ridadon (ankaŭ) ĉe serioza maturulo.« (G. S., E, 1927, p:162).

Volapük. De 1881 ĝis 1889 tiu ĉi lingvosistemo konstruita de prelato Schleyer, havis tiajn sukcesojn kiuj okuvideble montris, ke artefarita lingvo estas tute bone uzebla ĉar la int. rilatoj, 300 societoj, pli ol 1000 diplomitaj instruistoj, pli ol 300 lerniloj kaj libroj, 25 gazetoj en tiu lingvo — tiaj estis la atingoj de V. Sed dum 2-3 post-sekvintaj jaroj, la V.-movado komencis rapide malkreski kaj baldaŭ tute ĉesis. La pereon influis certe la formalestrukturaj mankoj de V., sed ankorau pli gravan rolon en la disfalo ludis la motivoj socie-organizaj. V. estis finkonstruita de unu homo, arbitre elektinta por sia lingvo radikojn kaj gramatikajn regulojn, ne liginta sin tiurilate per internacie jam ekzistantaj normoj. Rezulte, aperis lingva vermiĉelo, en kiu sub la formo »Bodugän« estis ne eble diveni Portugalujon; sub la formo »plim« la int. vorton komplimento. La arbitro de la V.-konstruo antaŭdifinis ĝian nepran dependon por ĉiam de la subjektiva bontrovo de ĝia aŭtoro. Tiamaniere V. povis disvolviĝi nur laŭ tiu direkto kaj nur en tiuj kadroj, kiuj ŝajnis akcepteblaj por la bontrovo de Schleyer. Tio bremsis la normalan evoluon de la lingvo, eliminis — malgraŭ la

struktura simileco al la naturaj lingvoj — la eblon libere evolui kaj pliriĉiĝi. Ankorau kreskis la neebleco de normala lingvo-evoluo pro la personaj opinioj kaj organiza politiko de Schleyer. Li konsideris V-on »sia lingvo«, »sia« propraĵo. Li malakceptis ĉiun penson, ke iu ajn (ĉu persono, ĉu kolektivo) povu direkti la evoluon de »lia« lingvo. La prezidantoj de la volapükistaj societoj estis devige konfirmataj de Schleyer. Okazis, ke unuanime elektitaj gvidantoj de regionaj kaj naciaj volapükistaj societoj ne estis konfirmataj kaj ricevis senapelacian rifuzon de Schleyer. La ĉefaj kontingentoj de volapükistoj ne povis akcepti tiajn despotajn organizformojn. La movado por la monda lingvo postulis demokratiecon. Tiam dum 1888—89 okazis demokrata revolucio, direktita kontraŭ la tirana reĝimo de Schleyer. La tria int. kongreso de V. en 1889 en Parizo, dum kiu ĉiuj raportoj kaj diskutoj okazis nur en V., kategorie malakceptis la pretendojn de Schleyer pri aŭtokrata direktado de la movado kaj lingvo kaj elektis Akademion, kiu devis direkti dum la estonto la pluan evoluon de V. Schleyer restis sola kun malgranda grupo da adeptoj de sia reĝimo, la Schleyer-a lingvo haltis en sia progreso v. Idiom-Neutral.

Vondroušek Josef, ĉeĥo, bankoficisto en Brno. Nask. 1 dec. 1904 en B. E-isto de 1922. Daŭre funkciulo de la EK, UEA-del., ĈAE-komitatano. 4 jarojn red. E-rubrikon en ĉeĥlingvaj gazetoj »Ruch« kaj »Novy Lid«.

Vörös Cyrill, hungaro, d-ro, prof. en pens. nun unu el la gvidantoj de la hungara piarista ordeno. Publikis en 1910—12 tri originalajn matematikajn verkojn en E. De aŭtuno 1934 li loĝas en Sátoraljaújhely.

Vortaro de Esperanto. De K a b e, 1910, 1ra eid. 1925, 175 p. Aperis 8500 e-roj. »Bein nur celis doni la tute bonajn fidindajn vortojn, kiujn sentime la E-istoj povos uzi. Ĝi certe fariĝos la ĉefa fonto, el kiu la naciaj vortaristoj ĉerpos, kaj kiu tre utilos por uniformigi la diversajn vortarojn de nia lingvo.« (C. Bourlet, La Revuo. 1910, p:537.)

Vortfarado. La bazo de la E-a VF estas:

1. La Zamenhofa eldiro: »La gramatikaj finiĝoj (kaj sufiksoj) estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.

2. La principo »de Necesito kaj Sufiĉo (de Saussure). (v. tie.)

3. La Saussure-a konstato: ĉiu vorto kaj sufikso (krom la senkaraktaraj) havas difinitan radik-karakteron (substantivan adjektivan aŭ verban) fiksitajn en la Fundamenta Vortaro. Krome la vortoj havas vort-karakteron gramatikan, dependan de la finaĵo (o aŭ a aŭ i), kiun ili havas. Se la radik-karaktero kaj finaj-karaktero samas (samelementa vorto), la finaĵo estas pleonasma. En la mala okazo (malsamelementa vorto), la finaĵo havas la funkcion de memstara vorto. Homo, sana, skribi estas samelementaj; homa, sani, skribo estas malsamelementaj vortoj. La vortkarakteron de samelementaj vortoj ni povas ŝanĝi per simpla finajŝanĝo, ĉar la radiko kunportas en la novan vorton sian sencan donitan per la radikkaraktero (homa signifas hom-rilata, homapartena, aŭ hom-kvalita, do en ĝi sinteziĝas la sencoj de la substantiva radiko hom kaj de la adjektiva finaĵo a; marteli estas martel-agi, do en ĝi al la senco de la subst. radiko martel gluiĝas la senco de la verba finaĵo i). Sed se ni pliformas vorton malsamelementan, kaj volas en ĝi konservi ankaŭ la sencan de la fremdkaraktera finaĵo, ni devas la finaĵon anstataŭigi per elemento samsignifa al la finaĵo. Al a (kvalita) samsignifas e c, al i samsignifas a d. Do, dum el la samelementa (adjektiva) preciza ni ricevas precizo (kvalito) per simpla finajŝanĝo, el la malsamelementa (substantiv-adjektiva) homa ni devas formi la vorton homeco (kvalito), anstataŭigante la elfalintan a-finaĵon per la sufikso e c. Same, dum el la samelementa (verba) bati ni ricevas bato (ago) per simpla finajŝanĝo, el la malsamelementa (substantiv-verba) marteli ni devas fari la vorton martelado (ago), anstataŭigante la elfalintan i-finaĵon per la sufikso a d, sen kiu ni

revenus al la vorto martelo (ilo): La E-a VF do konsistas simple el la sintezo de la elementoj necesaj kaj sufiĉaj por doni la deziratan sencan al la vorto. Sekve la E-a VF estas simpla vortkunmeto. v. Vortkunmeto, Verbigoj senpera, Kategoriosufiksoj.

La kontraŭuloj de la sistemo postulas la senkaraktarecon de la radikoj. Sed tio estas kontraŭ la Fundamento, kiu klare fiksis la radikkarakterojn (broso: io; kombo: ago aŭ agrezulto). Oni kontraŭmetis, ke la radiko tajlor funkcias jen substantive (tajloro), jen verbe (tajlori). Sed ĉi tiu kontraŭdiro estas facile refutebla. En tajlori ne la radiko funkcias verbe, sed la finaĵo i. Se necesus tiel, tajloro povus signifi jen personon, jen agon. Kaj evidente ĝi neniam havas la lastan signifon, kiun oni signas per tajlorado (anstataŭigante la elfalintan i-finaĵon per la ag-signifa sufikso a d).

La supra sistemo estas parte akceptita de la Akademio (punktoj 1 kaj 2), parte ankoraŭ ne (punkto 3). Cetere tio ŝajnas mallogika, ĉar sen la gramatika karakterfikso de la radikoj la principo de Necesito kaj Sufiĉo havas nenian sencan.

Literaturo. Kolowrat: »Pri la derivado en ido kaj E«, 1909; »Oficiala Gazeto Esperantista«, apr. 1911, dec. 1912; Fruictier: »Esperanta Vortfarado laŭ la Fundamento«, 1914; Devjatnin: »Esperanta afiksaro«, 1913; René de Saussure: »Fundamentaj Reguloj de la Vort-teorio en E«, 1915; »La Vortstrukturo en E«, 1916; E. E. Cefeč: »La Elementoj kaj la Vortfarado«, 1911; Panel: »Studo pri la Vortfarado de E«, 1912; Wüster: »La tri Fundamentaj Reguladoj« (HDE, 1922); Wüster: »Oficiala Radikaro enkonduko kaj notoj«, 1923; Paul Nylén: »Sonoj kaj Vortoj de E«, 1930; Kalocsay: »Lingvo, Stilo, Formo«, 1931.

Vortform-riĉeco. Morfologia sistemo de esperanto faciligas esprimon de la plej delikataj senc-nuancoj. Ekz. de radiko bov oni povas derivi: bovo, virbovo, bovino, bovido, virbovido, bovidino, bovoro, bovejo, bovisto, bovajo, bovidajo, ktp. En angla ling-

vo oni devas uzi tute diversradikajn vortojn: ox, bull, cow, calf, steer, heifa, herd (of cattle) byre, herdsman, beef, veal, bovine, ktp.

Oni prave asertas, ke en ĉiu lingvo plej riĉe estas evoluintaj tiuj fakoj, kiuj estas piej proksimaj al ordinara ĉiutaga mastrumado kaj ekonomio de la popolo uzanta tiun lingvon.

Tiel ekzemple en somala lingvo estas tre vaste ellaborita terminaro rilate la kamelon — ĉefan mastrumobjekton de somali-popolo.

S. Marin en artikolo »Mortpezo kaj efikeco« citas tutan serion da tiusencaj somali-vortoj, kiuj trovas nur 2-3 respondecajn vortojn en la riĉaj franca kaj angla lingvoj.

En E ĉkzistas tamen ĉiuj necesaj leksikologiaj kaj gramatikaj rimedoj por esprimi ĉiujn ĉi ideojn — ĝis tiom subtilajn, kiel virkamelido, kamelidineto, fruktigokamelo, buĉokamelino, kamelareto, ktp.

Do tiu eco de E montras, ke ĝi pli ol iu natura lingvo kontentigas la int. bezonojn laŭ sia esprimpovo, ke ĝi povas kontentigi tiurilate bezonojn de kiu ajn nacia lingvo.

Novaj vortoj povas esti derivataj kaj uzataj laŭ bezono; kaj samtempe la ĝenerala vortaro de E ne fariĝas pro tio tro ampleksa, ĉar novaj vortoj estas kreataj el la kombinoj de vortoj-radikoj simplaj, elementaj.

DREZEN, Skizoj, p: 33-35.

Vortkunmeto en E. En vortkunmetoj la ĉefa vorto staras en la fino (ĉefelemento); ĝi difinas la sencon de la vorto, kiun la antaŭe staranta elemento (flankelemento) nur klarigas, nuancigas. La ĉefelemento (ĈE) difinas ankaŭ la gramatikan vortkarakteron de la flankelemento (FE).

1. Substantiva ĈE substantivigas sian FE-on. Do: skribmaŝino estas skribmaŝino; orĉeno estas: oro-ĉeno; ĉeno el oro (analizo laŭ materialo: M); membroabonanto estas membro abonanto (analizo epiteta: E). Se la FE ne estas substantiva radike, ĝi substantivigas laŭ vortsenco: varmenenergia: varmo-energia; belkulto: belokulto, voluptamo: voluptoamo (amo de volupto). Do vortoj ki-

aj belknabino, bluokulo, ktp., ĉe kiuj la FE estus adjektiva, estas kontraŭaj al la spirito de la E-a vortkunmeto.

Tamen ekzistas kelkaj tiaj vortoj: sovaĝbesto, dikfingro, junedzo, etburĝo, ĝentilhomoo. Ĉi tiuj parte imitas nacilingvajn formojn kaj estas kvazaŭ memstaraj radikvortoj, parte estiĝas per la prefiksigo de kelkaj adjektivradikoj (sovaĝ', et', jun', nov', sol' ktp.); ili estas lernendaj aparte.

2. Adjektiva ĈE same substantivigas sian FE-on, kaj rilatas al li per la prepozicio je; belriĉa: beloriĉa; riĉa je belo; drinkema: ema je drinko.

3. Verba ĈE faras el sia FE aŭ adverbos: bonfarti: bone farti; aŭ (predikatan) adjektivos: ruĝigi: iĝi ruĝa; ŝtatigi: iĝi ŝtata.

Ĉi tiu fenomeno, nomata vortefiko, okazas same ĉe radikoj, sufiksoj kaj finaĵoj. Finaĵo a (adjektiva ĈE), se ĝi ne estas pleonasma, substantivigas sian FE: skriba estas skribo-a (rilata al skribo), ama estas amo-a, rilata al amo. Finaĵo i (verba ĈE) adverbigas: marteli: martele i: agi martele.

Sajnaj kontraŭdiroj estiĝas ĝuste per ĉi tiu okaza memstareco de la finaĵoj (v. Interelementa Rilato).

Krom la supre skizita rekta vortefiko, (iranta de dekstre al maldekstre) ekzistas ankaŭ vortefiko inversa (de maldekstre al dekstre). Ekzemple en la vorto miljaro la vorto mil postulas post si pluralon. Per tio evidentiĝas, ke la finaĵo o ne povas rilati sole al la elemento jar, sed nur al ambaŭ elementoj (mil kaj jar) kune. La analizo do estos (mil jar)o, aŭ ĉar mil nepre pluraligas, (mil jar)o: tempo de mil jaroj.

Same: en senforta la prepozicio sen postulas post si substantivon. Ĝi do memstarigas la finaĵon a, substantivigas la adjektivan radikon fort (sen forto)a. La analizo de grandkuraĝa (ĉar adjektivo postulas post si substantivon) estos (granda kuraĝo)a: karakterizita de granda kuraĝo.

La analizo de la kunmetitaj vortoj okazas tiel, ke unue ni provas la ana-

lizon laŭ la tri vortefik-reguloj (1, 2, aŭ 3). Se tiel ni ne havas senchavan rezulton, ni memstarigas la finaĵojn, kaj rilatigas la du antaŭajn radikojn inter si, kiel duoblajn flankelementojn. Ĉe tio ni esploras ankaŭ, ĉu ne ekzistas inversa vortefiko.

KALOCSAY

Noto de M. C. Butler. Mi ne konsentas la malpermeson uzi la formojn »belknabino«, »bluokulo«. Ili ŝajnas al mi tute bonaj.

Vastan pritrakton pri la Vortkunmeto oni trovas en mia Lingvo, Stilo, Formo (1932).

v. Vortfarado, Kategorisufiksoj.

Ofteco de afiksoj kaj prefikse uzataj prepozicioj en la »Originalata Verkaro« de Z., en la »Historio de E.« de Privat (P) kaj en la »Hura« de Baghy (B).

	Z	%	P	%	B	%
ad	2347	9.325	335	6.033	705	4.998
it	2089	8.316	402	7.239	866	6.140
mal	2072	8.254	264	4.754	983	6.969
ant	1986	7.920	360	6.483	938	6.650
ig	1603	6.395	392	7.059	871	6.175
ig	1479	5.899	425	7.653	1170	8.295
ist	1255	5.006	402	7.239	416	2.949
ec	1015	4.048	220	3.962	555	3.934
el	971	3.873	81	1.458	141	1.000
ar	934	3.725	241	4.340	230	1.631
at	745	2.971	100	1.800	264	1.872
sen	666	2.656	56	1.008	328	2.325
inter	643	2.564	218	3.926	68	0.482
eg	553	2.205	33	0.594	201	1.425
ebl	547	2.181	112	2.017	266	1.886
al	526	2.098	96	1.728	179	1.269
ne	441	1.759	78	1.404	259	1.836
en	419	1.671	69	1.242	173	1.226
aj	366	1.459	120	2.161	374	2.651
re	342	1.364	63	1.134	371	2.630
int	322	1.284	112	2.017	348	2.467
an	269	1.073	97	1.746	193	1.368
ul	235	0.937	88	1.584	376	2.665
et	233	0.929	17	0.306	409	2.899
um	219	0.873	12	0.216	134	0.940
dis	208	0.829	105	1.898	44	0.312
ont	204	0.814	8	0.145	48	0.340
ind	200	0.797	41	0.738	144	1.021
ism	189	0.754	43	0.774	37	0.262
uj	173	0.690	43	0.774	38	0.269
sub	165	0.658	52	0.936	79	0.560
trans	161	0.642	13	0.234	109	0.773
pri	153	0.610	22	0.396	176	1.248
kun	153	0.610	147	2.647	32	0.227
antaŭ	144	0.574	56	1.008	50	0.354
ek	117	0.466	32	0.571	364	2.381
in	96	0.382	41	0.738	1059	7.508
ej	82	0.327	133	2.395	155	1.099
kontraŭ	80	0.319	25	0.450	32	0.227
de	64	0.255	36	0.648	37	0.262
il	62	0.247	46	0.828	117	0.829
tra	60	0.239	8	0.144	22	0.155
ot	58	0.231	10	0.180	12	0.085

	Z	‰	P	‰	B	‰
em	47	0.187	68	1.224	161	1.141
ĝis	43	0.171	7	0.126	18	0.127
<i>eks.</i> - ekster	43	0.171	46	0.824	37	0.262
<i>supre</i> super	36	0.144	9	0.162	27	0.191
ge	31	0.124	17	0.306	88	0.624
on	27	0.108	8	0.144	48	0.340
<i>stari</i> anstataŭ	24	0.095	4	0.072	11	0.078
sur	24	0.095	4	0.072	23	0.163
post	20	0.080	72	1.296	61	0.432
obl	14	0.057	7	0.126	10	0.071
pri	12	0.048	1	0.018	11	0.078
laŭ	11	0.043	18	0.324	39	0.276
<i>ĉirkaŭ</i> ĉirkaŭ	11	0.043	6	0.108	26	0.184
per	6	0.024	2	0.036	29	0.205
ĉe	5	0.020	9	0.162	23	0.163
id	4	0.016	3	0.054	33	0.234
eks	2	0.008	6	0.108	8	0.567
er	2	0.008	1	0.018	10	0.071
<i>prete</i> preter	1	0.004	4	0.072	11	0.078
io	1	0.004	1	0.018	0	—
<i>malgraŭ</i> malgraŭ	1	0.004	0	—	0	—
bo	1	0.004	1	0.018	32	0.227
ĉj	1	0.004	—	—	—	—
nj	1	0.004	—	—	—	—
op	1	0.004	0	—	4	0.028
aĉ	0	—	3	0.054	13	0.092
por	0	—	2	0.036	3	0.021

Oŭteco de la korelativoj en la »Originala Verkaro« de Z. kaj en la »Hura« de Baghy (B). Laŭ la Z-a oŭteca ordo.

	Z	‰	B	‰	Z	‰	B	‰	
kiu	2598	17.016	547	11.804	tie	133	0.871	140	3.021
ĉiu	2167	14.194	132	2.848	iam	117	0.766	36	0.777
tiu	1967	12.883	906	19.551	kiom	96	0.629	29	0.626
tio	948	6.209	483	10.422	tiom	88	0.576	41	0.885
kial	830	5.436	104	2.244	kies	73	0.478	45	0.971
ia	652	4.270	44	0.949	kie	71	0.465	102	2.201
tiam	620	4.061	120	2.589	kial	58	0.380	104	2.244
kiam	469	3.072	182	3.927	ĉie	26	0.170	1	0.021
tia	465	3.045	151	3.258	neniel	25	0.164	17	0.367
tiel	437	2.862	257	5.366	nenie	16	0.105	0	—
tial	436	2.856	13	0.281	neniom	13	0.085	1	0.021
kio	414	2.711	309	6.668	nenies	6	0.039	0	—
ĉiam	373	2.443	76	1.640	ies	5	0.033	0	—
ĉio	339	2.220	126	2.719	ial	4	0.027	0	—
iom	310	2.030	183	3.949	ie	4	0.027	7	0.151
kia	216	1.415	46	0.993	iel	3	0.020	2	0.043
nenia	214	1.378	14	0.302	nenial	1	0.007	0	—
nenio	196	1.284	71	1.532	ĉiom	0	—	0	—
neniam	191	1.251	84	1.813	ties	0	—	15	0.324
neniu	190	1.244	46	0.993	ĉiel	0	—	0	—
ĉia	184	1.205	4	0.086	ĉial	0	—	0	—
io	154	1.008	83	1.791	ĉies	0	—	0	—
iu	150	0.983	113	2.437					

Ofteco de prepozicioj en la Originala Verkaro de Z., Ĉirkaŭ la mondon
Eŭropo ĉe la abismo de Nitti-Kreuz (E), Vortoj de Lanti (L), La Devo
Haefker (H), Historio de E-de Privat

	Z	% ₀₀	Sch	% ₀₀	B	% ₀₀	MT	% ₀₀	E	% ₀₀
de	7554	28.170	1354	29.380	753	17.990	965	22.195	3190	34.866
en	4139	15.440	—	—	686	16.390	918	21.114	1909	20.865
al	3927	14.640	—	—	712	17.020	440	10.120	748	8.176
por	2546	9.500	372	8.070	234	5.590	137	3.151	407	4.448
pri	1172	4.370	147	3.050	175	4.180	130	2.990	453	4.951
kun	1007	3.750	406	8.810	279	6.660	263	6.049	183	1.900
per	908	3.380	202	4.380	147	3.510	174	4.002	341	3.727
el	820	2.960	222	4.810	193	4.610	152	3.496	141	1.541
da	693	2.580	303	6.570	73	1.740	65	1.495	213	2.328
laŭ	450	1.680	52	1.030	9	0.210	15	0.345	117	1.278
post	362	1.340	128	2.780	50	1.200	74	1.702	224	2.446
sur	346	1.280	318	6.900	229	5.470	185	4.251	113	1.235
antaŭ	309	1.152	78	1.690	101	2.410	114	2.622	122	1.333
inter	308	1.148	67	1.450	29	0.690	29	0.667	88	0.965
ĝis	285	1.063	60	1.300	36	0.860	31	0.713	93	1.016
pro	281	1.048	102	2.210	91	2.150	90	2.070	144	1.573
sen	266	0.992	37	0.800	18	0.420	15	0.345	48	0.524
kontraŭ	258	0.962	14	0.300	27	0.630	33	0.759	104	1.136
je	186	0.693	76	1.650	50	1.200	69	1.587	191	2.088
sub	170	0.639	45	0.980	35	0.840	38	0.874	63	0.688
ĉe	167	0.623	135	2.930	92	2.150	66	1.518	20	0.216
anstataŭ	135	0.503	4	0.080	4	0.090	2	0.046	13	0.142
dum	123	0.458	175	3.800	59	1.415	79	1.817	137	1.497
malgraŭ	99	0.369	0	—	1	0.024	6	0.138	21	0.229
krom	66	0.246	13	0.280	4	0.096	1	0.023	26	0.284
po	53	0.198	9	0.190	1	0.024	2	0.046	9	0.098
ekster	48	0.179	1	0.020	3	0.072	0	—	0	—
super	46	0.171	20	0.430	11	0.263	47	1.081	10	0.109
ĉirkaŭ	31	0.115	34	0.740	11	0.263	19	0.437	7	0.077
tra	14	0.052	167	3.620	36	0.860	113	2.599	8	0.087
apud	8	0.030	22	0.480	20	0.478	34	0.782	2	0.022
trans	2	0.007	26	0.560	3	0.072	5	0.115	3	0.033
malantaŭ	1	0.004	4	0.080	7	0.167	11	0.253	0	—
preter	0	—	5	0.110	4	0.096	5	0.115	0	—
depost	0	—	0	—	0	—	14	0.322	1	0.011

Kiel en la naciaj lingvoj, ankaŭ en E-o, iom post iom maloftiĝas certaj vortoj kaj formoj kaj ilian lokon okupas aliaj. Se oni atente observas la supran statistikon, oni povas konstati interesajn faktojn ĉi-rilatajn. Ekde la lingvaĵo de Z. longa estas la vojo ĝis la moderna »Viktimoj«, eĉ pli longa ĝis la »Vortoj de kamarado Lanti«. Kaj eĉ el tiaj malgravaj vortetoj, kiaj estas la tabel-vortoj, afiksoj aŭ prepozicioj, oni povas konstati ne nur la evoluon de la lingvo, sed oni povas fari pli konkludojn ankaŭ pri la nivelo, temorondo, ideologio de la verkisto.

Ĉe la korelativoj ni povas konstati

unuavice la grandan malpliigon de la vorteto ia (ĉe Z: 4.2%, ĉe Baghy 0.9%); tio montras, ke la lingvo pli kaj pli liberigas sin de la naci-kutima surgato de la nedifina artikolo. Maloftiĝas tial kaj kial; anstataŭ ili plioftiĝas pro tio kaj pro kio; ties kaŭzo estas certe la pli drasta esprimovo de la lastaj.

Ĉe la afiksoj oni povas konstati la malpliigon de la sufikso MAL (ĉe Z. 8.2%, ĉe Baghy 6.9%, ĉe Privat 4.7%). Tio montras, ke la »mal-mal-amikoj« rajte povas aludi al lingva tendenco. La venkon de la principo »sufiĉo kaj neceso« pravas la mal-

de Scherer (Sch), Viktimoj de Baghy (B), Mister Tot de Forge (MT), de Naville (D), Legu kaj parolu de Supichova (S), Jarmiloj pasas de (P), Vojo returne de Remarque (VR).

L	$\frac{0}{100}$	D	$\frac{0}{100}$	S	$\frac{0}{100}$	H	$\frac{0}{100}$	P	$\frac{0}{100}$	VR	$\frac{0}{100}$
964	24.389	922	40.742	1058	25.815	5435	36.576	2014	33.231	732	14.705
595	15.053	316	13.967	710	17.324	2362	15.896	1366	21.539	726	14.585
466	11.789	314	13.878	458	11.175	1175	7.907	514	8.481	573	11.511
441	11.157	132	5.834	255	6.222	719	4.166	410	6.765	288	5.786
332	8.400	112	4.950	127	3.098	260	1.750	402	6.633	165	3.314
97	2.464	31	1.372	135	3.294	383	2.577	131	2.161	328	6.590
169	4.275	95	4.200	197	4.806	885	5.955	220	3.630	187	4.356
165	4.174	77	3.403	163	3.977	562	3.782	167	2.755	239	4.802
87	2.211	22	0.972	89	2.171	136	0.914	65	1.073	171	3.435
39	0.986	22	0.972	26	0.634	125	0.841	75	1.237	25	0.502
32	0.809	19	0.840	55	1.342	309	2.080	96	1.584	139	2.792
80	2.024	20	0.884	203	4.953	239	1.608	35	0.578	212	4.258
41	1.037	4	0.177	37	0.903	100	0.673	43	0.710	139	2.792
67	1.705	16	0.707	32	0.781	221	1.487	75	1.237	52	1.044
17	0.441	6	0.265	35	0.854	257	1.729	28	0.462	76	1.527
80	2.024	41	1.812	72	1.756	165	1.110	49	0.808	93	1.868
29	0.734	1	0.044	17	0.414	45	0.303	16	0.264	33	0.663
31	0.784	7	0.309	19	0.463	294	1.978	21	0.347	45	0.904
63	1.593	40	1.768	54	1.317	300	2.019	64	1.056	108	2.169
19	0.481	17	0.751	42	1.125	227	1.527	25	0.412	57	1.145
86	2.176	22	0.972	52	1.268	139	0.935	58	0.957	170	3.415
5	0.126	1	0.044	3	0.073	13	0.087	7	0.116	2	0.040
57	1.452	6	0.265	78	1.903	159	1.069	75	1.237	99	1.988
6	0.152	1	0.044	5	0.122	8	0.054	6	0.099	21	0.422
2	0.051	2	0.088	6	0.146	47	0.316	18	0.297	10	0.200
0	—	0	—	2	0.048	0	—	4	0.066	7	0.141
0	—	4	0.177	2	0.048	2	0.013	4	0.066	2	0.040
9	0.228	5	0.221	17	0.415	78	0.525	5	0.083	52	1.045
1	0.025	1	0.044	9	0.219	54	0.363	7	0.116	39	0.783
9	0.228	3	0.1	22	0.536	68	0.458	19	0.314	61	1.225
1	0.025	1	0.044	18	0.438	25	0.168	8	0.132	66	1.326
2	0.051	1	0.044	10	0.244	46	0.310	5	0.083	34	0.683
0	—	0	—	1	0.024	16	0.107	0	—	21	0.422
0	—	0	—	1	0.024	1	0.007	1	0.016	4	0.080
4	0.101	0	—	1	0.024	0	—	23	0.380	0	—

oftiĝo de la sufikso ECO kaj precipe de ADO (ĉe Z. 9.3, ĉe Baghy 5%). Tre interese estas, ke plioftiĝas la uzo de la prefikse aplikataj prepozicioj (ekz. *postrigardi* anstataŭ *rigardi post*); tio do estas evidenta tendenco en la lingvo.

Inter la prepozicioj precipe okulfrapa estas la malpliĝo de la prepozicio MALGRAU. Tio ne estas ĝojinda, ĉar SPITE DE, uzata anstataŭ ĝi, havas nuancediferencon, kies perdiĝo estus malriĉiĝo por la lingvo. Tie ĉi do la statistiko avertas nin, ke ni gardu la lingvon kontraŭ tia perdo.

Kvankam ne apartenas al la temo

de lingvo-evoluo, tamen estas interese ankaŭ la konkludo, kiun la supraj statistikoj ebligas pri la temosfero, ideologio, stilo de la verkistoj. Ekzemple, ĉe la verkistoj batalantaj por ideo videble plioftas la prepozicio POR kaj la multaj aludoj kaj paraleligoj plioftigas la prepozicion PRI, dum ĉe la simple priskribaj verkoj ili maloftas (POR: ĉe Lanti 11.1%; ĉe Scherer 8%; PRI: ĉe Lanti 8.4%; ĉe Scherer 3%). Ni povas konstati, ke ĉe multaj verkistoj tiu aŭ alia prepozicio preskaŭ aŭ tute mankas, dum ĉe la edukfaka Supichová ĉiu estas trovebla bonproporcie.

Estas bedaŭrinde, ke la supra statistiko de sro Stancliff ne enhavas sufiks-ciferojn pri pli multaj verkistoj; tre okulfrapa estas la granda ofteco de la sufikso EGA en la verkoj de Forge kaj Scherer.

Ankoraŭ multajn konkludojn oni povas ellegi el la supraj tabeloj, sed tio ja ne estas farebla inter la kadroj de Enciklopedia artikolo. Ni volis montri nur la vojon. La legantoj havas la gvidfadenon, laŭ kiu oni povas profundigi en la multedirajn rubrikojn, kiuj unuavide eble por multaj ŝajnis nur sensignifa ciferamaso.

EMBA.

Vortoj de Kamarado E. Lanti, kun antaŭparolo de L. Banmer. SAT, 1931, 191 p. Kolekto de artikoloj aperintaj ĉefe en »Sennaciulo«. Titoloj de la ĉapitroj: Mondlingvo, Organizado, Edukado, Sennaciismo, Pacismo, Priskriboj, Polemikoj.

Vortludoj aŭ kalemburoj (laŭdire laŭ la nomo de la franca apotekisto Calembourg, kiu vivis komence de la 18-a jarcento) en E tute nova, antaŭ la milito 1914 preskaŭ nekonata speco de spritajoj. Dum la spritajoj ĝenerale konsistas en trovado de similecoj inter malsamaj objektoj, la vortludoj serĉas malsamajn signifojn inter sam- aŭ similonaj vortoj kaj frazoj. Jen kial vortludoj estis longe malkonataj en E, kiu fieras pri sia matematika precizeco kaj logika konstruo, ecoj, kiuj kontraŭas dusencecon.

Z mem zorge evitis miskomprenojn, kiuj povus veni pri vortoj, kaj vipero (vip-ero), cigareto (cigar-eto), k. s. kaj anstataŭe uzis en U. V. vipuro, cigaredo, k. s.

Tiel do okazis, ke jam la U. V. entenas tiajn vortludojn, kiaj estas ekz. aĉeti: aĉ-et-i, domaĉeto: dom-aĉ-et-o; aerolito: aero-lito; agordi: ag-ordi, ktp.

Sekve eĉ en la U. V. oni trovas amason da radikoj, kiu povas servi kiel materialo por vortludoj, kaj tiu amaso plimultiĝas, kompreneble, en la pli postaj aldonoj al la U. V., ne plu tiel atente farataj vidpunkte al la principo de logiko kaj nekonfuzebleco, kiel faris aŭ — ĝustadire — celis fari Z.

Tiel ni posedas amfiteatron: am-fiteatron, aŭtografon: aŭto-grafon, akcidentojn: akci-dentojn, arbaleston: arb-al-eston, ktp.

Ne finiĝas ĉi tie la eblajoj de E. La senfina afiksebleco de E senmezure plialtigas la nombron de vortludeblaj esprimoj. Ekz. lekanto: lek-anto, kaprido: kap-rido, montrilo: mon-tri-lo, ventregulo: kiu povas esti aŭ ventr-egulo aŭ vent-regulo, ktp.

Estas konkludeble, ke E posedas grandegan riĉaĵon da kalemburoj kaŝitan en sia vortrezoro, malgraŭ la ŝajna matematika rigideco. Tial la E-aj vortludoj povas esti rigardataj kiel grava semo por kreskigi la E-an humoron.

Ekzemplojn de vortludoj donis d-ro Dreher en »Amuzaro«, kie ni trovas jenan »anonctablon«: Al la apartamento parte apartenas aparta portaparato (lifto). La plej famaj vortludoj en E estas tiuj de Verdkata Testamento de R. Schwartz.

(v. Humoro.) L. DREHER.

Noto de M. C. Butler. La plej elstara literaturajo vortluda estas la verko de Inglanda »Edziĝo malaranĝita«, kies 44 paĝoj estas efektiva amaso da vortludoj. — Oni tre multe vortludis en E antaŭ 1914 kaj mi memoras oftajn vortludojn de la tempo de la Bulonja Kongreso.

Vortoj de Macue Sasaki. Kompilis »Klara Rondoco. 1934, 125 p. Kolekto de originalaj kaj trad. artikoloj de M. S. (v.) Respeguliĝas nobla, larĝvida animo, kiu estis malfermita por la suferoj, kiujn kaŭzas mizero, militarismo, virina sklaveco kaj aliaj malbonoj.

Vortoj de Profesoro Th. Cart. Deŝitaj de S. Grenkamp kaj R. Lajarte, 1927, 140 p. 44 interesaj, zorge elektitaj artikoloj (precipe el L. I.) de la estinta prez. de la Akademio, el kiuj la »nov-generacianoj« povas ekscii, »laŭ kiaj principoj E sukcesis eviti — kaj ankaŭ evitos, — la danĝerojn de deflankiĝo kaj de eventuala morto.« (El la Enkonduko.)

Vortordo. En E la vortordo estas libera; la deviga akuzativo kaj la nombra konformiĝo de substantivo kun adjektivo permesas grandan elasticon en la frazformado. Tamen en

bona E-a stilo troviĝas certaj limigoj de ĉi tiu libereco.

La ĉefa regulo estas, ke laŭeble ĉiuj frazeroj kunapartenaj staru unu apud la alia. Tiel ekzemple, la predikato sekvu post la subjekto, ilin apartigu maksimume adverbo. Precipe grava estas tio, se la subjekto estas persona pronomo. En prozo la persona pronomo staru ĉiam antaŭ la verbo, ankaŭ en la ordona modo. La subjekto-predikatan kompleksojn, kiel tuton, kompreneble oni povas tienreen ŝovi en la frazo.

La vortetoj ankaŭ, nur kaj ne staru ĉiam antaŭ tiu vorto, al kiu ili rilatas.

Se adjektivo havas komplementon, la plej uzata kaj klara sinsekvo estas: substantivo, adjektivo, suplemento. Ekz.: »La laboro postulanta grandan penon«. Tamen, plurfoje, precipe de rusoj, sed ankaŭ de Z, estas uzata ankaŭ la sinsekvo: adjektivo, komplemento, substantivo. Se la suplemento estas mallonga, unuvorta, ankaŭ ĉi tiu sinsekvo estas tute bona, precipe, se oni volas plie akcenti la adjektivon ol la substantivon. Ekz. »La plena plena de homoj ĉambro«.

En frazoj, kiuj montras post rekta parolo la parolanton, la predikato antaŭas la subjekton, escepte se la subjekto estas persona pronomo. Do: »Venu«, diris Johano. Sed: »Venu«, li diris.

En ĉefprop-oj la lasta vorto estu tiu, al kiu la rilata pronomo de l' dependa frazo rilatas.

La personaj pronomoj akuzativaj (min, vin, lin, ŝin) laŭeble ne staru ĉe la fino de l' frazo, ĉar tiamaniere, kiel Z. rimarkigis, ili ricevas troan akcenton; krome estas malagrabla, ke ofte sinsekvaj pluraj frazoj rimas inter si. Ĉi tiujn vortetojn do oni kaŝu en la frazo, plej oportune estas ilin loki antaŭ la verbo.

v. Sintakso. KALOCSAY.

Noto de M. C. Butler. »Johano diris« kaj »diris li« ŝajnas al mi egale bonaj.

Waart Gerarda de, nederlandano, instr. Nask. 25 jun. 1887 en Dordrecht. E-isto de 1925. Prop-is E-n en Portugalujo en 1929 per diversaj paroladoj. En 1929, aŭtune, ŝi gvidis

kurson por la Popoluniversitato en Hilversum, kaj post la kurso fondis Sekcion de LEEN. Poste gvidis kursojn por komerciernejo, klerigadkursoj, organizitaj de la urbo, ktp. Prop-is ankaŭ en la ĉirkaŭaĵo de H., kaj fondis du aliajn sekciojn de LEEN.

Wackrill (ŭakril) Alfred Edward, anglo, inĝeniero. Nask. 11 febr. 1862, mortis 16 aŭg. 1924 en London. Laboris super konstruo de Tay-ponto, en Skotlando. Ĉeftermuristo en Cejlono. Pioniro de E en Britujo. Kelkajn jarojn redaktis »The British East«. Akademiano. Verkoj: »Konkordanco al la Ekzercaro«; »Venecia Komercesto«; »Ok Noveloj« (Arnold Bennett), angla traduko de »Esenco kaj Estonteco«; granda manuskripta konkordanco: »Z-a Trezorejo« (en la Biblioteko de BEA); kaj multe da unuaranga laboro literatura, pedagogia, recenza. Revizia redaktisto de la traduko de la »Nova Testamento«.

Wadham (ŭodm) Frederick Edward, anglo, bankoficisto. Nask. 1 marto 1902 en Battersea, London. Instr. de E oficiale difinita de la Londona Kleriga Aŭtoritato, instruis en vesperaj lernejoj de 1923. Londona EK: sekr. 1926, vicprez. 1927, prez. 1929—33, dir. de instruado 1933. BEA: Konsilanto kaj membro de ekzekutiva komitato 1924—26 kaj denove de 1934; agado ĉe diversaj komitatoj, komisiono por la licenciata ekzameno de 1932. UEA-del. de 1923, brita ĉefdel. de 1933. Helpred. de »Int. Language« 1924—26. Trad. »Riĉa kaj sen mono« de E. P. Oppenheim, L. K. de 1932.

Wahl (val) Edgar Alexei Robert, von, balt-germano, instruisto de matematiko kaj fiziko en supera reallernejo, nun pensionita; antaŭe oficiro de la rusa milita maristaro. Nask. 11 aŭg. 1867 en Bogopol, loĝas en Tairlinn, kie li estis komunuma delegito, 1911—17. Estis pioniro de E, kunfondinto de la unua ES en Rusujo, »Espero« en Petrograd. Verkis E-hispanan vortareton en 1889, laŭ la unua malgranda rusa de Z. Trad. el la rusa: »Princino Mary«, rakonto de Lermontov, 1896. Kunlaboris al »La E-isto«. Post la voĉdonado pri la ŝanĝoj en E, 1894, li forlasis la E-movadon kaj publikigis en 1922 la

int. lingvon Occidental (v.) kaj la revuon Kosmoglot.

Waldenberg Aleksandro, polo, d-ro. La plêj unua E-isto en la tuta mondo, laŭ atesto de Z «Universo», 1910/11, II. (volumo). 5 dec. 1878 kiel gimnazia kolego de Z li ĉeestis la feston de naskiĝo de »Lingve Universal«, do li estas la unua »pra-e-isto«.

Wallon (valon) Karl, germano, komercisto (oficejinstalajo). Nask. 25 jan. 1873 en Plesz (Silezio), mortis 7 aŭg. 1932 en Dresden. E-isto de 1889. Fondis grupon en Braunschweig, 1906, multe laboris ankaŭ en Aschersleben, Breslau, Frankfurt a. M. (artikoloj, paroladoj, kursoj). Batalo kontraŭ Ido, 1911. Alfaris al E la germanan unuecan stenografion (»Rapido«, 1927).

Walter Carl, germano, eldonanto de E-aj libroj. Nask. 26 okt. 1868 en Stuttgart. Verkis la spritajn »Gaja Lernolibro«, »Gajaj Vesperoj«, »Gajaj Horoj«, ĉiujn tri en la lastaj jaroj.

Wanek (vanek) Karl, aŭstro-germano, dir. de fabriko. Estis prez. de EG en Linz kaj de AEA. Multe klopodis por reunigo de la E-movado en Aŭstrio.

Wanitsek (vaniček) Emil, germano, kasisto de la urba ŝparkaso en Bratislava. Nask. 2 sept. 1873 en B. (hungara nomo: Pozsony, germana: Pressburg.) Dum 1885—88 li estis volapükisto. E-isto de 1910. En 1911 li fondis grupon en B., kiun li gvidas ĝis nun. Li faris en B. pli ol 70 kursojn. En 1930 radio-kurso el B. Tradukis multajn poeziajn kaj prozaĵojn. Ofte estis deklamata lia traduko »Ŝiprompiĝo« de Fr. Coppé.

Warden (ŭordn) John Mabon, skoto, aktuaro (asekura matematikisto). Nask. 8 okt. 1856 en Edinburgh, mortis 7 marto 1933 en E. Dum kvindek jaroj (1. 1. 1874 ĝis 31. 12. 1923) en unu vivasekura societo (Scottish Equitable). »Fellow« de la Fakultato de Aktuaroj; ĉiam interesata pri matematikistaj problemoj, stenografio (kolektis ĉirkaŭ 5,000 librojn pri ĝi), kaj genealogia serĉado. En 1903 lernis E-n; de 1905 instruis ĝin; multe propagandis kaj prilaboris ĝin. 1916—1922 prezidanto de BEA; de 1909 LK, de 1920 akademiano kaj vicprez.,

prez. de 1931. Servis en komitatoj de la antaŭa Centra Oficejo, kaj estis prez. de ĝia Konstanta Kongresa Komitato. Ĉeestis ĉiujn UK de 1905, kun escepto de tiu de 1915 (San Francisko). Unu el verkintoj de »Edinburga Poŝvortaro E-a«, (unua eldono 1915), dekkvara, reviziita kaj pligrandigita eldono 1931. Cefredaktoro por »La Sankta Biblio«, 1926.

Waringhien (varengjen) Gaston, franco, licea profesoro, literatura recenzisto de radio Lille P. T. T. Nask. 29 jul. 1901 en Lille. Prop. delegito de la Norda Federacio de SFPE, sekra red. de »Politika Sociala Revuo«. Gvidis kursojn, sed konata precipe sur la literatura, gramatika kaj vortara kampoj, kunlaboras en la Bulteno de la »Ligue française des Amis de l' E«. Kunlaboranto de L. M., kie li aperigis krom recenzoj kaj literaturaj studoj poemojn originalajn, kaj tradukitajn el Heine, Baudelaire, Hugo, Heredia, ktp. Liajn tradukojn distingas brila formo, granda enhava fideleco, arta lingvo, perfekta transdono de sento kaj penso. En siaj pripoeziaj recenzoj, kiuj atestas pri larĝskala kaj delikata kulturo, lin pleje interesas stilaj kaj formaj problemoj. Multe li okupiĝis pri poeziaj demandoj, la rezultoj de siaj studoj li resumis en sia »Skizo de E-a metriko«, aperinta en la libro »Parnasa Gvidlibro« (1932), kiun li verkis kune kun Kalocsay. Kelkaj liaj lingvaj studoj aperis en la Lingva kritiko de HDE. Granda laboro de li kuŝas en la Plena Vortaro de E, 1930. LK de 1926. TOTSCHÉ.

Warnier (varnje) Georges, franco, administranto de komercaj societoj. Nask. 5 okt. 1884 en Paris. Agema membro de Rotary-Klubo. E-iĝis en 1903 kaj de tiu momento ne ĉesis propagandi per ĉiuj rimedoj. En 1906 fondis la »Librejon de E«. De 1906 ĝis 1913 gvidis multajn kursojn. Sekr. de la X-a Kongreso, Paris, 1914. Prez. de la Pariza grupo de 1924. Prezidis la Lokan Komitaton de la XXIV-a Kongreso, Paris, 1932, kaj tiun kongreson li sukcesigis malgraŭ gravegaj malfacilaĵoj. Malavare fondis kun Archdeacon la »Domon de l' E«, kiu subtenas ĉiujn praktikajn formojn de propagando en Francujo, kaj kies vic-

prez. li estas. Disvastigis E ĉe la Rotarianoj. Membro de la Konsilantaro de la Int. Cseh-Instituto de E; efike helpis al enkonduko de tiu instrumentado en Francujo, kaj al ĝia sukceso. Unu el la plej agemaj francaj prop-istoj, precipe en komercistaj medioj. Krom artikoloj, li verkis kun Chavet: »E-Manuel«, 1906 (55.000 venditaj ĝis 1932); »Dictionnaire français-E«, 1911; »Corrigé d' E-Manuel«, 1912.

Warszawa (elp. Varŝava, E-a nomo Varsovio), ĉefurbo de Polujo, sur ambaŭ bordoj de la rivero Wisla (Vistulo), 1,100.000 loĝantoj. En 1887 tie eliris »la unua broŝuro« pri E, tie Z verkis ĉiujn siajn elaboraĵojn E-ajn, tie li pasigis sian preskaŭ tutan vivon ekde sia 12-a jaro, tie en la hebrea tombejo troviĝas la tombo de Z. Ĉe strato Dzika, nuntempe nomata Zamenhofa sub n-ro 9, kie dum multaj jaroj loĝis kaj verkis Z, nun estas enmurigita tabulo honore je lia memoro. La lastajn jarojn de sia vivo Z pasigis en la loĝejo ĉe strato Królewska 41. Plenmerite W. estas nomata lulilo de E. Krom la Majstro en W. vivis kaj kreadis la unuaj pioniroj de E-movado kaj literaturo: Grabowski, Zakrzewski, Kabe, Leo Belmont, Wasniewski, ktp. Pilgrimoj al W., precipe al la tombo de Z, okazadas relative ofte, menciindaj ĉefe: 6 aŭg. 1927 post la UK en Dancigo kaj 9 aŭg. 1931 post la UK en Krakovo. (v. Dzika 9, Królewska 41, Monumento de Z, Polujo, kaj Z.)

E. WIESENFELD.

Washington. Ĉefurbo de Usono; 486.280 loĝantoj. — 6-a UK 15—20 aŭg. 1910; 357 kongresanoj el 20 landoj (60 anoj el Eŭropo). Provo de tutmonda organizo.

Wasniewski Jozefo, polo, ĵurnalisto. Nask. en 1859, mortis 19 febr. 1897. Unu el plej agemaj unuaj pioniroj de E, »Nia Apostolo en Polujo«. (L. I. N-ro 3. 1897.) Liaj verkoj troviĝas en »La E-isto«, »L. I.« kaj »Fundamenta Krestomatio«. En 1896 lia originala novelo »En la Brikejo« estis premiita dum la unua E Lit. Konkurso de L. I. Li la unua komencis la tre gravajn vojaĝojn inter-E-istajn.

Watzinger (vacinger) Franz, aŭstro-

germano, fakinstr. en Villach. Nask. 15 aŭg. 1898 en V. Prop-is en Kärnten. Arangas ĉiujare kursojn. Kunlaboris al HDE; »E' kaj »La Socialisto«.

Weder (veder) Theodor, usona civitano, laboristo en kemia industrio. Nask. 24 febr. 1900 en Gross-Schönau, Germanujo. Eklernis E-n en publika lernejo. Dum milito kiel soldato en hospitalo renkontis E-istojn inter anglaj militkaptitoj. Tio ligis lin pli forte al E. De 1923 propagandas en New York. Eldonis 1930 »Ĉirkaŭ la globo«, 1931, »Sennaciista Bulteno«. Faris en 1931 vojaĝon tra diversaj landoj kaj parolis por lab. grupoj. Ekde sept. 1932 eldonas »The Workers' E-Letter«, por prop. inter laboristoj.

Weinhenst (vajnhengst) Johan, aŭstro-germano. Nask. 27 jun. 1904 en Kuffern. E-isto de 1920. Kunlaboris kun ALLE-estraro, kaj la loka grupo, gvidis kursojn. Estis sekr. de ISE. Verkis poemojn kaj rakontojn por la SAT-organoj 1928—32. De 1932 kunlaboris al »La Socialisto«. En liaj poemoj la socialistaj pensoj estas vestitaj per poezia ĉarmo, en la rakontoj oni trovas bone pentritajn figurojn de la jungitaj sklavoj, kiuj ĝismorte tiras la jugon de la bienegoj kaj fabrikoj. En 1934 aperis de li la originala romano »Tur-Strato 4.« (v.) EMBA.

Weinstein (vajnŝtajn) Halina, polino, privata instr. Nask. 4 jan. 1902 en Varsovio. Gvidas eldonsekciojn de Studenta EA, vicdel. de UEA. Gvidas Cseh-kursojn. Trad. kaj verkis originale poeziaĵojn kaj prozaĵojn publikigitajn en »P. E-isto«, k. a.

Wendell (üendel) Lehman, usonano, dentisto. Nask. 2 jan. 1878 en Sycamore (Illinois). E-isto de 1907. Viceprez. de EANA, 1910; prez. EG de Tacoma (Washington), 1913; prez. de EG de Minneapolis kaj St. Paul (Minnesota), 1925; viceprez. de EANA, 1927. Instruis E-n en Univ. de Minnesota de 1926. Tradukis »Sub la Meznokta Suno«; »Sep Ridoj«; kaj »La Lasta Usonano«.

Werber (verber) J., aŭstriano, d-ro, Mortis 15 jun. 1914 en Wien. E-isto de 1907. Fervora prop-isto, kiu subtenis la movadon ankaŭ per mono-

feroj. Speciale li subtenis »German-Aŭstria E-isto«, kiun li ankaŭ administris. Prez. de Ligo de Germanlingvaj E-istoj en Aŭ., 1909.

Wermke Agnes, germanino, instr. Parolintino por E ĉe la radio-sendstacio en Königsberg de 1927, ĝis la detruo de la demokratio 1933. Verkis: »La konsonant-kombinoj de E kaj la demando de l' silabo-disigo«.

Werner (verner) Ernst, aŭstro-germano, ŝtata oficisto en Vieno. Nask. 1 dec. 1902 en W. Studis multajn stenografiajn sistemojn kaj mem verkis (sed ne publikigis) E-stenografion. Aktiva E-isto de 1925 Estrarano de AEA. En la lastaj jaroj gvidis kun Pfeffer E-seminaron en Vieno E-Unio.

Westcott (ŭestkot) E. Martyn, d-ro. Mortis en 1907. Prez. de la grupo en Hastings. Trad. historiojn de H. G. Wells, kaj la »Kristnaska Sonorado« de Dickens, 1905.

Westen (vesten) Johannes, H. Th. J., nederlandano, studento. Nask. 31 aŭg. 1907 en Groningen. Estrarano de la NKEL, konsulo de IKUE. Kunlaboris al »Espero Katolika«, »Katolika Vivo« kaj »Brita Katoliko«.

Westmancote (ŭest'mnkot) William Frank, anglo, poŝta komizo. Nask. 30 jun. 1881 en Cheltenham. Regiona organizanto de Poŝtofistica Unio. Red. de loka poŝtista gazeto. E-isto de 1908. Restarigis E Societojn de Cheltenham kaj Bristol.

Wetkamp Wilhelm, germano, gimn. dir. en pensio. Nask. 4 sept. 1859 en Lippstadt. E-isto de ĉ. 1905 sekve de artikolo de A. H. Fried en pacifista gazeto. Kunfond. de la EG en Berlino. Artikoloj kaj prelegoj. De 1931 prez. de la »E-lernejo« en Berlino.

Wharff (hŭarf) Fred Leslie, usonano, edukisto. Nask. 7 nov. 1867 en Bangor (Maine). Instruis modernajn lingvojn en Univ. de California kaj en diversaj lernejoj. Nun instr. de E-kurso ĉe la nomita Univ.

Wien. (Vieno). Ĉefurbo de Aŭstrio; 1,866.000 loĝantoj. 16-a UK 6—14 aŭg. 1924 kun 3400 partoprenantoj el 40 landoj. Decidoj pri la kongresa regularo, lingva disciplino, rezolucio pri neŭtraleco. Poste: mult-

jara batalado por pagi la gravan deficiton. — 5-a kongreso de SAT 11-15 aŭg. 1925 kun ĉ. 150 partoprenantoj el 7 landoj. Decido, ke SAT restos supertendenca. Malaprobato pri futurismaj lingvaj eksperimentoj. — Antaŭkongreso 7 jul.—2 aŭg. 1929 kun la plimulto de la partoprenantoj de la 21-a UK, kun parolado de la ŝtatprezidanto Miklas okaze de la inaŭguro de la Int. E-Muzeo, fondita en 1928. — Int konferenco »E en la lernejo kaj praktikon,« 20—24 majo 1934.

Wierzchowski-Korczak (vjeĥoski-korĉak). Hieronimo, polo, juĝa senatano, membro de la iama aŭstria parlamento. Nask. 20 jul. 1860 en Lwów. Antaŭe Volapükisto. Unu el la unuaj E-istoj en la mondo, kiu posedas leteron E-an de Z datumitan 28 okt. 1887. Varma prop-isto, prez. de la ES en Lwów. Verkis lernolibron kaj gvidis tre multajn kursojn.

Wiesenfeld (vizenfeld) Edvardo, (ps. iama Edvardo Lonkopolanski), dentkuracisto en Varsovio. Nask. 27 marto 1892 en V. E-isto de 1912. La eksplodo de l' mondmilito trafis lin en Paris, kie li studis. 30 majo 1915 li akiris prof. diplomon de l' Int. Institututo de E (Privat kaj Cart). Dum 5 monatoj li laboris en la oficejo de UEA kiel tradukisto. En 1916 sukcesis reveni al V. kaj finis siajn univ. studojn en 1918. De 1916 bona amiko de la familio Z. Li fondis la Polan Instituton de E, kiun poste la kongreso oficiale rekonis; li gvidis ĝin ĝis 1930. Funkciulo de multaj E-Societoj en Polujo, sekr. de la Loka Monumenta Komitato. De 1922 li partoprenis aktive ĉiujn aranĝojn de la E-istaro en V., ofte kiel ceremoniestro. En 1928-29-30 (15 dec.) parolis okaze de la naskotago de Z tra la radiostacio V. Al du UK-j (Vieno kaj Genevo) estis sendata kiel reprezentanto de Konkordo (per la mono de la societo). Gvidis multajn kursojn. L. K. Dir. de ISO-SEK por Polujo. Li havis multe da referatoj, skribis multe da artikoloj, gvidis dum kelkaj jaroj E-Fakon en monata revuo »Przeгляд Swiatowy«, dum 1929-30-31 ankaŭ en la gazeto »Radjo«. En sia profesia gazeto li gvidis konstantan E-rubrikon (La

Dentista Kroniko) kun E-a resumo de ĉiuj artikoloj. Ĉiuj E-aj bultenoj, kongresnumeroj kaj artikoloj aperintaj okaze de ia Varsovia soleno estis verkitaj de W. Li publikigis artikolojn en 'E', 'Pola E-isto', 'HDE', 'LM', kaj en multaj aliaj gazetoj. Multfoje premiita de Katalunaj Floraj Ludoj. Originale verkis: 'Galerio de Zamenhofoj', 1925; 'Vivo kaj verkoj de Felikso Zamenhof', 1934; artikolojn pri elparolado kaj lernolibron laŭ Berlitz-a sistemo. Tradukoj: 'La ĝardenisto' de Tagore; 'Himnoj' de Wittlin; 'Ter' de neniu' de Erenburg; 'Venus kaj Sulamit' de Perec; 'La freneza Batlano' de Perec; 'Noveloj' de Baudelaire; 'Paradoksoj'. Biografiisto de ĉiuj eminentaj polaj E-istoj. Cefkunlaboranto de la Enciklopedio.

G. KARCZAG.

Wight (ŭajt) George William, skoto, registara oficisto. Nask. 6 marto 1869 en Alloa. E-isto de 1908. Multe vojaĝis per E kaj donacis multajn klišojn al BEA-kolekto.

Wiig Harald, norvego, bankĉefo en Stavanger. Nask. 15 nov. 1891. en S. Lernis E-n en 1907. Kursoj kaj paroladoj en S. 1907—09. Reaktivigis 1931. Aranĝinto de sukcesaj Cseh-metodaj kursoj en S. 1932—33. Estrarano de la loka grupo 1933.

Wildebrand Wilhelm, germano, lab. E-isto en Berlin; proks. 38-jara. Unu el la gvidantoj de la opozicio kontraŭ SAT, post la Essena kongreso de GLEA (1930) ties prez. ĝis la likvidiĝo en 1933. Oratora talento. Multaj artikoloj en »Arbeiter E-ist.«

Wilhelm Tell. Kvinakta dramo de Schiller, el la germana trad. L. E. Meier. 1906, 148 p. Lerta traduko.

Willcocks (ŭilkoks) Edmond William, anglo, apotekisto. Nask. 19 okt. 1880 en Portsmouth. Sekr. de Brita Sekcio de ISAE. Sekr. de Walhamstowa EG.

Williams Frederick James, brito, kuracisto en Samarai, Papuo. Nask. 12 jan. 1895 en Mornu Ponds, Aŭstralio (Vict.). Kvar jarojn li laboris kiel medicina misiisto en la Novaj Hebridoj, Cinujo kaj en Papuo. Dudek jarojn li laboris por int. amikeco,

paco kaj E. En 1928—29 prez. de ES en Sydney. Del. de UEA.

Winberg (vinberj) Carl, svedo, kassisto. Nask. 15 majo 1864 en Foss. E-isto de 1905. Membro de UEA preskaŭ de ĝia fondo. Kursgvidanto. Mecenato de blindula E-movado.

Wingen (vingen) Wilhe'm, germano, instr., stenografo de urba kaj provinca parlamentoj. Nask. 26 sept. 1895 en Köln. Milit servo; poste kaptito en Anglujo ĝis 1920. Multe laboris en sten. movado; lerniloj; red. de sten. revuo. E-isto de 1924. De tiam kursestro de la EG Köln. Sekr. de REVELO, 1927—30, poste prez. Sekr. de LKK por 16-a Germana E-kongreso kaj la 25-a UK. Gvidis radiokurson ĉe okcidentgermana sendstacio. Verkis (kun Jung) du lernolibrojn, 1929, 1932.

Witt (ŭit) Charles Ralph, usonano, dentkuracisto. Nask. 27 marto 1895 en Topeka (Kansas). Kunfondinto de EG en Los Angeles kaj Long Beach (Cal.).

Witteryck A. J., belgo, presisto. Mortis 69 jara 3 jul. 1934 en Assebroeck (Brugge). Pioniro de E, en 1904 fondis la Bruĝan EG. Estis dua prez. de BLE. Estis ankaŭ LK. Trad. al la flandra lernolibron de Cart kaj Pagnier, verkis kaj eldonis diversajn lernolibrojn kaj legolibrojn. Gvidis multajn kursojn. Kunlaboris je la 'Belga Sonorilo', 'Tra la Mondo', 'Belga E-isto', 'The British E-ist'.

Wollmann (volman) Franz, aŭstrogermano, d-ro, landlernej-inspektoro, »kortega konsilanto«. Nask. 12 febr. 1871 en Kriesdorf (nun en Ĉeĥosl.). Dir. de la ŝtata ekzamen-komisiono por E en Aŭ., pri kies fondo li multe klopodis (1925). Lektoro por E ĉe la ŝtata Teknika Altlernejo kaj ĉe la Urba Ped. Instituto en Wien. Komitatano de UEA.

Woud Gerrit, nederlandano, fabriklaboristo. Nask. 20 aŭg. 1886 en Zaandam. Lernis E-n en 1912 kun sia edzino. Pioniro de E en sia regiono. Kursoj, agado en la sindikata movado.

Wright (rajt) Isaac Henry, anglo, inĝeniero (il-maŝinoj, dentradoj). Nask. 14 nov. 1873 en Kighley. Sekr. de Tefi. Inĝ. Inst. E-isto de 1903.

Fondis grupon en Coventry, 1908 kaj en Northampton, 1911. Unua sekr. de Mezlanda Fed. Prez. de Okcidentmezlanda Fed., 1929—32.

Wu Ta-kwang, ĉino, licenciato (Peking Univ.), magistro de politika scienco (Columbia, Usono), direktoro por publika instruado en Canton, 1925. Nask. 1887 en Canton. Fondis E-Instituton kun urba subvencio, 1926, ĝia direktoro, 1927. Gvidas la movadon kun Hsu, Sinpak kaj Kenn. Vojaĝis Eŭropon kaj Amerikon, 1928, revenis en Canton, 1931. Fondis E-bibliotekon. Prez. de Cantona EA.

Wunderlich (vunderlij) Elisabeth, germanino, sekr. Nask. 6 sept. 1889 en Dresden. 1910—17 en la G. E-Libro en Leipzig. 1921—29 oficistino en la E-fako de la Leipziga Foiro. 1918—20 sekr. en la Saksa E-Instituto, de 1923 ĉe la E-Instituto por Germanujo. Ŝiaj taskoj: administrado de la ŝtata Saksa E-Biblioteko; prilaborado de diversaj statistikoj (ekz. la tutmonda statistiko en 1928); vasta korespondado. Preciza laboro, nelacigebla diligento.

Wurmbrandt Max, rumano. Nask. en 1901. E-isto de 1923. Faris kursojn en Fokŝani kaj Bucuresti, estis sekr. de RES. Trad. el rumana lingvo por LM kaj HDE.

Wüster (vister) Eugen Bernhard Caspar, germano, doktoro-inĝeniero. Nask. 10 okt. 1898 en Wieselburg, Aŭstrio. Verkoj: a) Tradukaĵoj: Kabanov, »La germana inteligentularo kaj la milito« (el la rusa lingvo, kun Maske), 1917; »La efiko de la U-boata milito« (el la germana, kun aliaj), 1917; »Pilorio« (el la G, kun aliaj), 1917; Hauff, »La Kantistino« (el la G), 1921; Chamisso: »Petro Schlemil« (el la G), 1922; b) Traktaĵoj pri la E-movado aŭ lingvo: »La lastaj tagoj de l' Majstro« (kun aliaj), 1921; »Die Bedeutung der Welthilfssprache E für den Techniker«, 1921 kaj 1924; »Die Verhältnismörter des E«, 1923; »Int. Sprachnormung in der Technik, 1931; c) Vortaroj: »La oficiala radikaro«, 1923; »Maŝinfaka E Vortaro«, 1923; »Enciklopedia Vortaro E-G«, 1923, 1925, 1926, 1929, ĉe Hirt und Sohn, Leipzig; »Z Radikaro«, 1927. Gravege signifa sciencisto

de E. De li devenas la vorto Esperantologio, kies ĉefa kulturanto li estas. Lia granda Enciklopedia Vortaro E-G estas la plej funda kaj detala registro de la Z-a lingvo-uzo. Liaj esperantologiaj artikoloj profunde kaj klarvide sekvas la strukturon de la lingvo kaj grave kontribuis al la scienca fikso de la E-a vortsistemo. Tre grava estas lia laborado pri la teknikaj vortaroj.

Yagi (jagi) Hideo, japano, d-ro med., prof. de medicina fakultato de Okayama. Del. de UEA en O. Nask. 18 aŭg. 1899 en Nada, apud Kobe. Ekkonis E-n en 1914. En 1919 tondis grupon en Tria Nacia Kolegio, 1920 ĝian organon »Liber-o«. Verkis: Kurslibro de E«, 1921; »J-E Vortareto« (kun Sakurada, Yasuda, Okumura), 1922; »Fremdlingva Problemo en J-ujo« (J), 1924. Kelkaj medicinaj artikoloj en E.

Yanagida (ja-) Kunio, japano, verkisto. patro de J-a folkloro. Nask. 1875 en Tiba-ken. Unu el la dir. de JEI. — (Kuw.)

Yarworth (jarüoth) Reginald Joseph, anglo, sekr. de akcia kompanio. Nask. 4 jul. 1893 en Grimsby. Verkisto de bonhumoraj noveloj, artikoloj kaj poemoj por diversaj E-revuoj.

Yelland (jel'end) Ernest Edward, anglo, ekskontoristo, gvidanto de Int. Hejmo E-ista en Aspremont, apud Nice (A. M.), Francujo. Nask. 19 jun. 1880 en Devonport. E-isto de 1906. Fondis: »Tri Urboj E Grupo« (Plymouth, Devon) 1908. Prez. de Londona EK tri jarojn. Instruadis E-n dum 5 jaroj en vesperaj lernejoj publikaj en London, gvidis kursojn de 1908. Trad.: »La Granda Vizaĝo el ŝtono«, 1920.

Yelland Theresa, rusino, edzino de E. E. Y. Nask. 26 jan. 1882 en Poti (Kaŭkazo). Geedziĝo per E; E estas familia lingvo. Red. dum tri jaroj la gazeton »Liberpensulo«. Vojaĝis tra Eŭropo 1926—30 kun sia edzo proprakte por propagandi E-n. Dum 5 jaroj kune kun sia edzo publike paroladis pri E en Hyde kaj Finsbury Parkoj, London.

Ysner Henry, svedo, instr. popolerneja, abelbredisto. Nask. 21 sept. 1893 en Ysane. E-isto de 1929. Fond.

kaj prez. de loka grupo en Hällevik. Kursoj, ankaŭ lernejoj; prelegoj, ankaŭ perradiaj.

Ysselstein (iselŝtejn) Simon Joris, nederlandano, instr. Nask. 8 marto 1879 en Yselmonde. E-isto de 1912. En 1913 foriris al Ned. Hindujo kaj prop-is en urbo Soerabaia, poste an-

kaŭ kun predikato Kyftenbelt; artikoloj, rezolucio por E de la instr. ligo, 1928. En 1929 li forlasis Hindujojn kaj ekloĝis en Schiedam, kie li sukcesis oficiale enkondukigi E-n en la vesperaj kursoj por plenkreskuloj. Gvidis kursojn ankaŭ por senlaboruloj en S. kaj en Rotterdam.

Z

Zabilon D'her-Ranfaing (zabilongder) Jeanne (ps. Evidino), francino, prof. de korekta prononcado. Nask. 26 jan. 1868 en Limoges. Interesiĝas pri dekoraciarto. Dediĉas sian vivon al la malfavoritoj de la naturo: surdmutuloj, balbutuloj, blinduloj. E-iĝis en 1895, tuj apostolis per paroladoj, artikoloj, kursoj. Instruis la blindan Hélène Giroud. En 1897 publikigis kurson specialan por stenografiistoj kun granda sukceso. En 1898 organizis la unuan prop. paroladon en Lyon. Pro senlaca propagando kaj sindonemo ricevis la medalon de »Touring-Club« (1902). Organizis sola int. loterion por la tutmonda blindularo (tri reĝinoj kotizis), kaj ricevis la titolon »Bonfaranta Feino«. Zorgis pri la blinduloj en kongresoj. Krom noveletoj en E-aj gazetoj kaj poezio, ŝi tradukis de Serre: »La hipotezoj pri Lourdes«, 1912.

Zakrzewski (zakŝevski) Adam, (ps. Z. Adam), polo, scienculo, en siaj lastaj jaroj estro de l' statistika sekcio ĉe l' Varsovia Magistrato. Nask. 1856 en Podola gubernio (Rusujo), mortis 1 nov. 1921 en Varsovio pro aŭtomobil-akcidento. Finis la fizik-matematikan fakultaton de la Peterburga Univ. Verkis multajn librojn, kunlaboris al la pola »Granda Enciklopedio«, ktp. Unue studis Volapükon, pri E okupis sin ŝajne jam en 1894-95. Poste studis ankaŭ aliajn lingvoprojektojn, ĉe kreis en 1896 »Lingva International«. Fine li revenis al E kaj partoprenis la 1-an UK-n. Apartenis al la unua Varsovia ES kaj en 1908 estis kunfond. de PES. Verkis valorajn artikolojn pri E por gravaj polaj ĵurnaloj. Fervore kun-

laboris ankaŭ por la E-a gazetaro. Speciale frapantaj per multscio kaj trafa inteligenteco estas liaj artikoloj refutantaj Idon, Antidon kaj aliajn reformprojektojn. La unua tuŝis la demandon »Pri transskribo de propraj vortoj.« Verkis profundan gramatikon kun sintakso. Ankaŭ pri E kompilis statistikan verketon: »E en unua dudekjaro«, 1908. Lia ĉefa verko: Historio de E« (1887—1912). Pollingve aperis lia granda studverko: »L. I. Historio - Kritiko - Konkludoj.« Estis L. K. E. WIESENFELD.

Zamenhof Adamo, filo de Z, ĉefkuracisto de la okulpavilono de hebrea hospitalo en Warszawa. Nask. 11 jun. 1888. Multe skribis pri sia specialeco. E. W.

Zamenhof Aleksander, (ps. AZO aŭ A. Z.), d-ro, la plej juna kaj plej amata frato de Z, kuracisto. Nask. en 1877, mortis kiel kolonelo de la rusa armeo en 1916 en Dinaburg. E-isto de la unuaj jaroj de E. Kunlaboranto de IMR. E. W.

Zamenhof Felikso, (ps. FeZ, aŭ Zef), farmaciisto, frato de Z. Nask. 6 nov. 1868 en Bialystok, mortis 4 dec. 1933 en Varsovio. Estis varmkora amiko de la orfoj. Unu el la unuaj en la familio de Z, kiu lernis E-n. Kiel juna knabo li konatiĝis kun la ideo de sia frato, do la aŭtoro de E havis iun, kun kiu li povis konversacii en la nova lingvo. F. Z. helpis ankaŭ al la disvastigo de la Unua Libro, post ties aperigo okupiĝis pri la administra flanko de la afero: li pakis, adresadis kaj dissendadis la broŝuron laŭ diversaj pene akiritaj adresoj. Partoprenis la lokan kiel ankaŭ la int. movadon dum sia tuta vivo. Ĉestis multajn

UK-jn, estis ano de ICK. Ekde la unuaj jaroj li laboris sur la literatura kampo kaj jam en »La E-isto« (Nürnberg) aperis liaj versaĵoj. Poste ofte li aperigadis siajn originalajn — plejparte humorajn — versaĵojn, ĉefe en »La Revuo«, »Ondo de Ē«, »Pola E-isto«, L. M. Dediĉe al la UK en Boulogne, li verkis la poemon »La Homa Doloro«. Du poemoj ankaŭ en »Fund. Krestomatio«.

Zamenhof Klara, edzino de Z. Nask. kiel f-ino Silbernik 6 okt. 1863 en Kowno, mortis 6 dec. 1924 en Varsovio. Senhezite fordonis sian tutan doton por la eldono de la Unua broŝuro, 1887. Estis ĉiama kunlaboranto kaj helpanto de la edzo, ofte plenumis liajn administrajn kaj sekretariajn taskojn. Ankaŭ post la morto de Z aktive partoprenis la movadon. Dank' al ŝia kunhelpo, fondiĝis la E-Rondo »Konkordo« en V. Ceesitis ĉiujn UK ĝis la Viena 1924, kiu estis ŝia lasta renkontiĝo kun la E-istaro.

Zamenhof Leono, (ps. Lozo, aŭ Zetel), polo, d-ro, frato de Z, kuracisto de malsanoj de gorgo, oreloj kaj nazo. Nask. 31 okt. 1875 en Varsovio, mortis 7 febr. 1934 en V. Ampleksa faka verkado: ekz. »Historio de medicino« kun biografioj, aforismoj kaj anekdotoj (en pola lingvo). E-isto de 1898. Partoprenis en ĉiuj okazajoj de la loka E-movado. Fondinto de ES »Konkordo« en V. Kelkan tempon estis vicprez. de PES. L. K. kaj korespondanto de la Akademio, ĉefkunlaborinto de L. M. Red. de »P E-isto«, 1908—13. Li verkis multajn originalajn poemojn. Kiel apartaj libroj eliris liaj tradukoj: »Aspazio« de Swietochowski; »Protesilas kaj Laodamia« de Wyspianski; »Mia Liro« (kolekto) kaj aliaj. E. W.

Zamenhof Lidja, plej juna filino de Z, Cseh-metoda instruistino de E. Nask. 29 jan. 1904. Ŝi lernis E-n kiel 9 jara knabino. Fininte en 1925 la universitaton (jura fakultato), ŝi fordonis ŝin tute al E. Ŝi fariĝis sekr. de ES »Konkordo« en Varsovio aranĝis ofte paroladojn kaj kursojn. Ekde la UK en Vieno, 1924, ĉiun UK ŝi ĉeestis, faris prop. vojaĝon kaj gvidis en diversaj landoj multajn kur-

sojn. Literatura agado: la tradukaĵo de la ampleksa libro pri Bahaismo: »Baha' u'llah kaj la Nova Epoko« de Esslemont, »Parizaj Paroladoj de Abdul Baha«; originale verkita: »Homo, Dio, Profeto«. El ŝia pure literatura agado estas menciinda ŝia traduko de »Iridiono« de l' klasika pola aŭtoro Krasinski, kiel ankaŭ noveloj de B. Prus, kaj »Quo Vadis«, de Sienkiewicz. Kunlaboranto de multaj E-aj gazetoj (»P. E-isto«, L. M., k. a.). Kunlaboranto de la Enciklopedio.

E. W.

Zamenhof Ludoviko Lazaro: Vivo.

Kiu povus pli bone rakonti la vivon de Z, ol li mem? Tial mi ne faros alion, krom kopii leteron, kiun Z sendis al Michaux, prez. de la Bulonja Grupo, la 21. feb. 1905, kaj kiu ne estas ĝis nun publikigita.

»Kara Sinjoro — Vi petas, ke mi donu al Vi detalojn pri mi kaj mia vivo. Tre volonte mi tion ĉi faros, kiom mi povos, sed bedaŭrinde mi povos fari ne tre multe. Jen estas la kaŭzoj: por la estontaj generacioj mia biografio eble estos ne sen-interesa, ĉar efektive mia tuta vivo, de la plej frua knabeco ĝis nun, prezentas unu konstantan kaj seninterrompan serion da diversaj bataloj: a) interne en mi konstante bataladis reciproke diversaj idealoj kaj diversaj celadoj, kiuj ĉiuj egale estis por mi ordonaj, sed kiujn reciproke interkonsentigi estis ofte trege malfacile, kaj tio ĉi multe min turmentadis; b) ekstere mi ofte devis bataladi kontraŭ diversaj malhelpoj, ĉar neniam miaj idealoj apartenadis al la idealoj en modo kaj tial neniam mankis al mi mokantoj kaj atakantoj. Krom tio mi tre multe da jaroj havis grandajn kaj tre turmentajn klopodojn kun la akirado de mia pano kaj tiu ĉi batalado pri la pano tre venenis mian vivon. En la lastaj jaroj mi fine atingis tion, ke pano jam al mi ne mankas; sed ho ve, la longa batalado min tre laciĝis, kaj nun, ne havante eĉ plenajn 46 jarojn, mi jam sentas min kiel homo 60-jara.

Mi naskiĝis en Bialystok la 3/15. de Decembro 1859. Mia patro (marĝene: kiu ankoraŭ vivas) kaj avo estis instruistoj de lingvo. La homa

lingvo estis por mi ĉiam la plej kara objekto el la mondo. Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukata, t. e. la lingvon rusan; mi lernadis ĝin kun plej granda plezuro; mi revis iam fariĝi granda rusa poeto (margene: en la infaneco mi skribis diversajn versaĵojn kaj en la 10-a jaro de mia vivo mi skribis 5-aktan tragedion.) Mi kun plezuro lernadis ankaŭ diversajn aliajn lingvojn, sed ili interesadis min ĉiam pli teorie ol praktike; kaj ĉar mi neniam havis la eblon ekzerciĝadi en ili, kaj ĉar mi ĉiam legadis nur per la okuloj, sed ne per la buŝo, tial mi libere parolis nur en tri lingvoj (ruse, pole kaj germane), la lingvon francan mi legas libere, sed parolas ĝin tre malmulte kaj malbone; krom tio mi en diversaj tempoj lernis iom ankoraŭ ĉirkaŭ 8 aliajn lingvojn, kiujn mi konas tamen nur tre malmulte kaj nur teorie.

En mia infaneco mi amis tre pasie la lingvon rusan kaj la tutan rusan regnon; sed baldaŭ mi konvinkigis, ke mian amon oni pagas per malamo, ke ekskluzivaj mastroj de tiu lingvo kaj lando nomas sin homoj, kiuj vidas en mi nur senrajtan fremdulon (malgraŭ ke mi kaj miaj avoj kaj praavoj naskiĝis kaj laboris en tiu ĉi lando), ĉiuj malamas, malestimias kaj premegas miajn fratojn; mi vidis, ke ankaŭ ĉiuj aliaj rasoj loĝantaj en mia urbo sin reciproke ĉiuj malamas kaj persekutas... kaj mi multe suferis de tio ĉi, kaj mi komencis revadi pri tia feliĉa tempo, kiam malaperos ĉiuj naciaj malamoj, kiam ekzistos lingvo kaj lando apartenantaj plene al ĉiuj siaj uzantoj kaj loĝantoj, kiam la homoj ekkompreneblas kaj ekamas unuj la aliajn.

En la jaro 1869 mi eniris en la Bialistokan realan gimnazion; sed post du monatoj mi devis eliri pro grava malsano (en mia infaneco mi tre ofte estadis malsana); en 1870 mi eniris denove kaj mi lernis kun grandaj sukcesoj (mi devas rimarki, ke en la tuta 9-jara daŭro de mia gimnazia lernado, kiel en Bialystok, kiĉl poste, en Varsovio, mi estis ĉiam la unua en mia klaso; la instruantoj rigardadis min kiel treege kap-

ablan kaj miaj kolegoj profetadis (margene: sen ia envio, sed tre bondezire, ĉar neniam mi havis inter la kolegoj ian malamikon), ke mi havos en la vivo ĉiam la plej grandajn sukcesojn; tio ĉi tamen poste tute ne plenumiĝis kaj mi longe devis batali ĝis mi ellaboris al mia familio-modestan panon). En 1873 miaj gepatroj transloĝiĝis Varsovion, kie mia patro ricevis la oficon de instruisto de germana lingvo en la reala gimnazio. Mi restis 5 monatojn dome por lerni la lingvojn latinan kaj grekan, kaj poste mi eniris en la Varsovian 2-an filologian gimnazion, kiun mi finis en la jaro 1879. Tiam mi forveturis Moskvon kaj eniris tie en la medicinan fakultaton de la tiea universitato. Miaj Moskvaj kolegoj estis reprezentantoj de tre multaj plej diversaj rasoj, kaj tio ĉi fortikigis en mi la celadon al unuigita homa familio. Baldaŭ la financa stato de miaj gepatroj fariĝis tre malbona, ili ne povis jam tenadi min en Moskvo, kaj tial en 1881 mi revenis Varsovion, eniris tie en la universitaton, kiun mi finis en la komenco de Januaro 1885. Mi forveturis tiam en la vilaĝon Vejsje, por komenci kuracistan praktikon. Praktikinte tie en la daŭro de 4 monatoj, mi konvinkigis, ke mi por la komuna medicina praktiko tute ne taŭgas, ĉar mi estas tro impresiĝema kaj la suferoj de la malsanuloj (precipe de la mortantoj) tro multe min turmentis. Tiam mi revenis Varsovion kaj decidis elekti por mi specialecon pli trankvilan, nome la malsanojn de okuloj. Mi laboris en la daŭro de 6 monatoj en la okulista apartaĵo de unu Varsovia malsanulejo, poste mi lernis kelkan tempon en la klinikoj de Vieno (Aŭstrujo) kaj en la fino de 1886 mi komencis okulistan praktikadon en Varsovio. Tiam mi konatiĝis kun mia nuna edzino, Klara Zilbernik el Kovno (ŝi tiam gastis ĉe sia fratino, loĝanta en Varsovio). La 9-an de Aŭgusto 1887 mi edziĝis. Al mia fianĉino mi klarigis la tutan esencon de mia ideo kaj la planon de mia estonta agado. Kaj mi demandis ŝin, ĉu ŝi volas ligi kun mi sian sorton. Ŝi ne sole tute konsentis, sed ŝi donis

al mia tuta dispono la sumon da mono, kiun ŝi posedis, kaj tio ĉi donis al mi la eblon, post longa vana serĉado de eldonanto, fine eldoni mem (marginene: en Julio 1887) miajn unuajn kvar broŝurojn (lernolibro de Esperanto en lingvoj rusa, pola, germana kaj franca). Baldaŭ poste mi eldonis la »Duan libron«, »Aldonon«, »Neĝan Blovadon« kaj »Gefratojn« (verkitaj de Grabowski), Tradukon de »Dua Libro« kaj »Aldono«, Mezan Vortaron Germanan, plenan vortaron rusan, anglan kaj svedan lernolibron, Princinon Mary, Adresaron ktp., kaj mi ankaŭ donis la necesan monon por la eldono de la verkoj de Einstein kaj H. Phillips. Mi ankaŭ donis multajn anoncojn en la gazetoj, dissendis grandan nombron da libroj ktp.

Esperanto baldaŭ forglutis la pli grandan parton de la mono de mia edzino; la tutan reston ni baldaŭ formangis ĉar la enspezoj de mia kuracista praktiko estis terure mgrandaj. En la fino de 1889 mi restis sen kopeko!

Tre malĝoja estis tiam mia vivo. Mi devis forlasi Varsovion kaj serĉi mian panon en ia alia loko. Mia edzino devis forveturi kun mia infano al sia patro kaj mi veturis (en Novembro 1889) en la urbo Herson (suda Rusujo), kie ne estis okulistoj (marginene: tie estis nur unu okulistino), kaj kie mi tial esperis trovi panon por mia familio. Sed mia espero min terure trompis: miaj tiaj enspezoj ne sole ne donis al mi eblon nutri mian familion, sed eĉ por mi mem ili ne sufiĉis malgraŭ mia tre modesta kaj tre avara maniero de vivado! Mi simple kaj litere, ofte, ne havis eĉ kion mangi: tre ofte mi restadis sen tagmanĝo! Nek mia edzino, nek miaj parencoj ion sciis pri tio ĉi, ĉar mian edzinon mi ne volis malĝojigi, kaj en miaj leteroj mi konstante konsolis ŝin, ke estas al mi tre bone, ke mi havas tre bonajn esperojn, ke mi baldaŭ venigos ŝin al mi ktp. Tamen fine mi ne povis jam pli elteni kaj mi devis konfesi al mia edzino la tutan mian staton. Mi estis tiam ankoraŭ tro fiero, por akcepti de iu monan helpon; tamen

la malĝojego kaj la insistaj petoj de mia edzino devigis min akcepti monan subtenadon de mia bopatro (kiu tiam kaj ankaŭ poste neniam rifuzadis al mi sian helpon kaj elspezis por mi tre multe da mono) kaj mi revenis Varsovion, esperante, ke nun mia kuracista praktiko iros pli bone. En Majo 1890 mi revenis Varsovion.

Ankaŭ tiun ĉi fojon la espero min trompis. Miaj enspezoj tute ne pli grandigadis, miaj ŝuldoj kreskadis. Fine ne havante jam la eblon pli atendi, mi en Oktobro 1893 transloĝiĝis kun mia familio en la urbon Grodno. Tie miaj enspezoj estis pli grandaj ol en Varsovio kaj la vivo estis malpli kara. Kvankam ankaŭ en Grodno miaj enspezoj tute ne kovradis miajn elspezojn kaj mi devis ĉiam ankoraŭ prenadi subtenon de mia bopatro, tamen mi paciencis tenis min tie en la daŭro de 4 jaroj. Sed ĉar miaj infanoj pligrandigadis kaj postulis pli koston edukadon kaj la urbo Grodno estas tiel malriĉa, ke okulistoj neniam povos tie multe pligrandigi siajn enspezojn, tial laŭ la insistita deziro de mia bopatro mi en la fino de 1897 decidis denove reveni Varsovion kaj fari tie ĉi la lastan provon.

La stato de mia animo estis tiam terura. Mi sentis tre bone, ke tio ĉi estas mia lasta provo, kaj se ĝi ankaŭ nun ne sukcesos al mi, mi estas perdita. En la daŭro de la unua jaro mi preskaŭ frenezigiĝis de maldespero. Sed fine, dank' al la lasta streĉo de mia energio, la sorto komencis esti por mi pli favora. Baldaŭ mia kuracista praktiko komencis pli kaj pli grandigadi kaj jam de la jaro 1901, ĝi estas tiel granda, ke miaj enspezoj tute kovras miajn elpezojn. Mi estas savita. Post multaj jaroj de granda suferado kaj batalado mi nun fine ricevis pli trankvilan vivon, kaj havas tute sufiĉan panon por mia familio (kvankam kompreneble mi devas vivi tre modeste kaj kalkuli ĉiun kopekon). Mi loĝas en unu el la plej malriĉaj stratoj de Varsovio, miaj pacientoj estas homoj malriĉaj kaj pagas al mi tre malmulte; mi devas akceptadi 30—40 paci-

entojn ĉiutage, por havi de ili tiom, kiom aliaj kuracistoj havas de 5—10 pacientoj; tamen mi estas nun tre kontenta, ĉar mi havas mian panon kaj bezonas jam nenies helpon.

Mi havas nun 3 infanojn: unu filon kaj du filinojn.

Mi estas tre laca kaj lacigis ankaŭ Vin per mia longega letero. Adiaŭ!

Via L. L. Zamenhof.

Al la supra letero nur malmulto estas aldonenda. La gepatroj de Z nomiĝis Marko kaj Rozalio (naskiĝinta Sofer); lia unua filo, Adamo, naskita en 1888, fariĝis okulisto, kaj anstataŭis sian patron, je la fino de lia vivo, en la domo de la strato Dzika; lia unua filino, naskita en 1889, fariĝis kuracistino; lia dua filino, Lidya, naskita en 1904, plej fidele sekvis la vojon de sia patro, instruadante E-n kaj partoprenante la religion movadan Bahaismo.

La primitiva formo de E estis preta en la komenco de la vintro 1878 kaj Z kun siaj gimnaziaj kolegoj aranĝis en sia ĉambreto feston, kiun ili nomis »tago de vivo de la universala lingvo«. Sed li ne ĉesis prilabori ĝin: nur ĉe la jaro 1881 ni konas tri formojn malsamajn de la lingvo, kaj nur en 1885 li donis al ĝi ĝian definitivon aspekton. Poste li devis atendi ankoraŭ du jarojn antaŭ ol trovi eldoneblon.

De Nov. 1897 li loĝis en Varsovio, strato Dzika 9, en la malriĉa hebrea kvartalo. Kaj nur en 1905, la unuan fojon post 20 jaroj, li havis la eblon ĝui kelksemajnan libertempon kaj entreprenis kun sia edzino vojaĝon al la Bulona kongreso. Poste, dank' al la sumoj, kiujn pagadis al li La Revuo pro lia konstanta kunlaborado, li povis ĉeesti ĉiujn kongresojn, eĉ tiun de 1910 en Vaŝington (Ameriko). De 1905 ĝis la milito lia vivo fluis trankele kaj laboreme; la tutan tagon lin okupis lia profesio, nur la vesperon li povis dediĉi al siaj ambaŭ idealoj, internacia lingvo kaj senacia religio; inter ili du li dividis siajn fortojn kaj tempon.

Sur la E-kampo, liaj tradukoj aperadis regule, kun ĉiam pli granda sukceso.

Klopode al la homunuigado, li pub-

likigis en 1906, en Rusujo, anoniman broŝuron pri »Homaranismo«, titolo per kiu li anstataŭigis »Hilelismo«. De Beaufront kritikis ĝin tre akre en »L'Espérantiste«, kaj Z respondis al li, sed ĉiam anonime. En Jul. 1911 li prezentis al la Int. Kongreso de Rasoj, en London, memuaron, en kiu li asertis, ke »la intergenta diseco kaj malamo plene malaperos nur tiam, kiam la tuta homaro havos unu lingvon kaj unu religion«. Poste, por povi pli facile defendi siajn ideojn, ne kaŭzante malprofiton al la E-afero, li en 1912, ĉe la Kongreso en Krakovo, rezignis ĉian oficialan rolon en la aferoj de E, kaj eĉ la simplan titolon »Majstro«. Kaj ekde la sekvanta jaro li publikigis sub sia nomo novan, pli ampleksan eldonon de la antaŭa broŝuro, sub titolo »Deklaracio de Homaranismo«: evidente li volis aludi kaj kompletigi la »Deklaracion pri Esperantismo«, kiun li voĉigis en Bulonjo. En tiu momento, li ekpensis pri kongreso inter homaranoj kaj komencis klopodojn pri tio, kiam subite eksplodis la milito. Ĝi surprizis Z-on en Köln, survoje al Parizo. Li devis reatingi Varsoviajn tra Svedujo kaj Finnlando. Enfermite en sia urbo pro la bata'ego, baldaŭ en sia ĉambro pro la malsano, li daŭrigis sian nelacigeblan agadon. Li finis la tradukadon de la 4 volumoj de la Andersen-fabeloj, kaj de la tuta Malnova Testamento; samtempe li pretigis cirkuleron, alvokantan kunvenon de intelektuloj, kiu estus preparonta ĝeneralan universalan kongreson por neŭtrale-homa religio; li skizis grandaniman »Alvokon al la Diplomatoj«, publikigotan »post la Granda Milito«. Meze inter tiuj zorgoj, la morto kaptis lin, la 14 Apr. 1917. Ĝis la fino li restis fidela al tiuj idealoj, kiujn tiel bele esprimas la letero al Michaux.

Z estis malaltstatura, kun brune-griza barbetto, granda frunto, kaj kalva kapo; li portis pormiopajn okulvitrojn; li misprononcis la siblantajn konsonantojn; jam de ĉ. 1900 li suferis je malforteco de la koro kaj manko de pulso en la piedoj. Li estis pedante ordama en la ordinara vivo, naiva en aferoj, timema antaŭ publi-

ko, malinklina al ĉiuj oficialaj ceremonioj; nature modesta kaj pacama; li penis mildigi ĉiujn konfliktojn; li havis plej profundan senton pri justeco: je la 1a kongreso li memorigis en sia malferma parolo pri Schleyer, aŭtoro de Volapük, kies disĉiploj tamen siatempe akre atakis lin; je la 2a kongreso, li invitigis, pere de Michaux, siajn rivalojn, interalie Peano, aŭtoro de »Latino sine flexione«. Sed plej gravaj trajtoj de lia karaktero estas la volo, per kiu li ĉion oferis por siaj idealoj, kaj la pacienca obstino, per kiu li laboris por ilia efektigo; cetero tiun volon kaj tiun obstinon li ĉerpis el la senmezura amo, kiu puŝis lin alporti, per ĉiuj fortoj de sia korpo kaj spirito, iom da helpo al tiu fizike kaj morale blindiganta homaro.

Bibliografio: E. Privat. Vivo de Zamenhof; E. Drenzen. Zamenhof; A. Oberrotman. La lastaj tagoj de Dro L. L. Zamenhof; Wiesenfeld, Galerio de Zamenhofoj; Dro Leono Zamenhof. Biografio de Dro L. L. Zamenhof (Universo, 1910); Zamenhof-numero de La Nova Epoko (SAT 1929). (Bonan kompendion oni havas ĉe »Zamenhova Legolibro« de Kidosaki — J. E. I. —, tekstojn en »Originala Verkaro« de Zamenhof k. de Dietlerle). G. WARINGHIEN.

Zamenhof Ludoviko Lazaro: Verkaro.

La verkoj de Z dividiĝas en tri kategorioj: 1e la prilingvaj verkoj; 2e la tradukoj; 3e la originalaĵoj.

1e) En la prilingvaj verkoj rimarkindaj estas unue la prudento kaj toleremo de Z. La natura emo de elpensinto al arta lingvo estas plej detale elmontri ĉiujn flankojn de sia elpensajo: tiel faris Schleyer, provizante sian Volapükon per kompleta gramatiko kaj dika vortaro. Male Z liveris unue nur la minimumon, 16-regulan gramatikon kaj 917-radikan vortareton: »lasante ĉion alian al libera iom-post-ioma ellaboriĝado.« Ĉiam li evitis aldoni al la primitiva fundamento novajn devigojn; li timis ĉiujn troajn precizigojn, kiuj farigus katenojn. Preskaŭ sur ĉiu paĝo de Lingvaj Respondoj oni trovas

la saman ideon: »nur la uzo iom post iom ellaboros definitivajn regulojn... Ne venis ankoraŭ la tempo, ke ni estu tro pedantaj... Ni ne devas peni, ke nia lingvo estu tro preciza, ĉar tiam ni nin mem nur katenus... En tiaj okazoj, kie kelka libereco alportas al ni neniam malutilon, kial ni devus senbezone nin maliberigi?... Se grandamplaksan vortaregon... ni volus pretigi teorie kaj »en rapideco«, ni tre danĝere enkatenigus nian lingvon... ktp.«

Sed tiu toleremo estis ebla, nur ĉar la bazoj de la lingvo estis firmigitaj kontraŭ ĉia ŝancelo. Tion li atingis, havigante karakteron de netuŝebleco al la tri verkoj Gramatiko, Ekzercaro kaj Universala Vortaro, kiun li kolektis en 1905 sub titolo de »Fundamento de Esperanto«. Por ke iu ajn lingvo povu regule kreski kaj disvolviĝadi estas necese, ke enestis en ĝi ia potenco inertforto, kiu konservas al la plej granda parto de la lingvo oportunan sensanĝon kaj stabilon, nepran kondiĉon por interkompreniĝado. En la naturaj lingvoj, tiun inertforton prezentas la jarcenta tradicio. En E, kie tia ne ekzistis, Z anstataŭigis ĝin per la Fundamento, kun sia karaktero de »dogma« netuŝebleco. Tiu lingva tabuo estas, post la kreado mem de E, plej genia elpenso de Z. Ĝi certigas al ĝi senriskan evolupovon, kaj ebligis al Z tre libere proponi kaj uzi novajn vortojn (ĉirkaŭ 3 mil), el kiuj la plimulto estis poste registrita en la Oficialaj Aldonoj.

2e) La tradukoj prezentas en la verkaro de Z la plej ampleksan parton kaj mi diros eĉ la plej gravan. Lia unua traduko (La Batalo de la Vivo, de Dickens) ĉar ĝi ne estis siatempe eldonita libroforme, ne havis grandan influon. Sed la dua: »Hamleto de Ŝekspir«, kiun li publikigis en la »Biblioteko de la L. I. E.« renkontis senkomparan sukceson kaj pli efikas por la propagando de la lingvo, ol ĉiuj plej lertaj teoriaj admono. Li pruvis la movon malsante: certe la publikigo de Hamleto ludis gravan rolon en la batalo pri reformoj kaj multe helpis al la venko de la konservativuloj. Bedaŭrinde

diversaj cirkonstancoj malhelpis lin daŭrigi tiun fekundan laboron, kaj nur ekde 1905 la fondo de la Revuo fare de Carlo Bourlet donis al li la eblon rekomenci sisteman tradukon de gravaj literaturaj verkoj. Oni miras antaŭ la nombro da tiaj tradukoj aperintaj en la jaroj 1907—08: versajne kelkaj el ili estis jam pretaj de antaŭe kaj atendis nur eldoneblecon. Sed tamen lia rapideco estas eksterordinara: se oni memoras, ke li povis labori nur en la vespero, post longa laciga labortago, oni dubos, kiel li tradukis verse la kvin aktojn de Ifigenio en Taŭrido en la daŭro de 4 monatoj (marto-junio 1908). Cetere tiu rapideco ne estis sen malutilo: liaj tradukoj suferas precipe pro du difektoj: unue ili estas ne tre ĝustaj, en kelkaj lokoj eĉ ne mankas kontraŭsenoj (oni vidos sube, kiel profunde la anglaj teologoj devis modifi la Z-an Bibliion); due ili ne ĉiam estis ŝirmitaj kontraŭ la invado de nacilingvaj idiotismoj (tio estas precipe konstatabla en la traduko de Georgo Dandin). Sed oni devas konfesi, ke tiujn difektojn klarigas ankaŭ aliaj kaŭzoj: unue la metodo de Z, kiu neniam celis ekzaktan »kabinetan« tradukon, sed ĉiam preferis la pli vivan, pli rektan dirmanieron (tio klarigas, ke foje li tradukis ne el la originalo, sed el traduko germana: Hamlet, Fabeloj de Andersen ktp.); due la stato de la lingvo, ankoraŭ juna kaj malriĉa, kiu ne obligis redoni ĉiujn nacilingvaĵojn per trafa kaj int. esprimo. Tamen kia ajn estas la absoluta valoro de tiuj tradukoj, estas klare, ke ilia valoro rilate al la lingva evoluo estas grandega. Efektive ili pruvis al la kontraŭdirantoj, ke »E povas servi kiel lingvo por libera esprimado de ĉiuj geniaj verkoj de la homa literaturo«; ili kontribuis al la riĉigado de la vortaro pro la neceso redoni kelkfoje subtilajn idenuancojn de beletraj ĉefverkoj; ili helpis al la ellaborigado de la lingvo, devigante al penado por en tiu aŭ alia maniero nepre traduki tiajn esprimojn, kiujn ĉiu lingvo nepre devas posedi; ili progresigis E-n al »kreskanta elasteo« kaj fleksebleco, mem-

origante, »ke nia lingvo devas servi ne sole por dokumentoj kaj kontraktaj, sed ankaŭ por la vivo« (rimarkinde estas tiurilate la prefero de Z por traduko de teatraĵoj, kies vivaj dialogoj disvolvadis kaj ekzercadis la kvalitojn de la lingvo); fine ili stabiligis kaj fiksis la lingvon, prezentante multegan kvanton de kunmetaĵoj, vortkonstruoj, metaforoj kaj proverboj, komunan trezoron da pretigitaj difinitaj parolturnoj, kiujn leksikologoj zorge kolektis en la Enciklopedia Vortaro kaj en la Plena Vortaro, kaj kiujn aŭtoroj uzadas por la pli granda unuigo kaj kohero de la lingvo. Oni vidas, do, ke oni ne troigus la rolon de la Z-aj tradukoj dirante, ke sen ili E ne ekzistus: ĝi estus pala teoria fantomo, kiel Ido aŭ Occidental. Per siaj gramatikaj kaj vortaraj verkoj Z estis konstruinta la skeleton de la lingvo, sed nur dank' al sia persista traduko, li vestis tiun ostaron per sukplena, sangriĉa, brilkolora karno. La animon cetere ni serĉu ĉe la originalaj verkoj.

3e) La originalaĵoj konsistas ĉefe el antaŭparoloj al liaj diversaj verkoj, el traktajoj, kaj el paroladoj. Du pecoj havas apartan gravecon: la traktajo pri »Esenco kaj Estonteco de la ideo de lingvo internacia« kaj la kolekto de la Kongresaj Paroladoj. Oni trovas en la unua profundecon de penso, potencon de logiko, klaron de saĝo, kiuj donas al tiu libreto eksterkutiman valoron por klerigado. Ĝi estas verko klasika, en la plej forta kaj laŭda senco de la vorto. La Paroladoj estis, kvankam oficialaĵoj, plej intime pripensitaj kaj plej skrupule redaktitaj; Z penis enfermi en ilin ĉiujn siajn konvinkojn kaj esperojn, sian hom-amon kaj di-respekton. Celante »efiki sur la sentoj« pli ol sur la spiritojn, en tiu granda »korekscita religia« festo, kiel li imagis la Kongresojn, li provis esti la Predikanto »sub la verda standardo«. De la unua parolado en Bulonjo ĝis la lasta en Krakovo, ĉie oni sentas la entuziasmon de la kredanto, la idealismon de la majstro, la sindonemon de la homo. Li aspektas al ni kiel alia pli humana Moseo, gvidanta, admonanta

kaj konsolanta sian popolon trans ĉiuj malhelpoj de la vojo. Se mankas al li la kapabloj de granda oratoro, li tuŝas nin eĉ pli profunde per la simpleco de la stilo kaj la sincereco de la tono. Kiu volos posedi ĝustan bildon de Z, li prenu tiujn du malgrandajn librojn, la *Esencon* kaj la *Paroladojn*, lian tutan inteligenton kaj lian tutan koron. Ambaŭ estas el la nombro de tiuj nemultaj verkoj, kiuj honorigas la homaron.

(Ĉiuj citaĵoj estas Z-aj.)

Unua libro (en lingvoj rusa, pola, franca, germana) ĉe Kelter, Varsovio 1887; f-a traduko de la antaŭparolo en F. K. kaj O. V. — **Dua libro**. En esperanto. ĉe Kelter, Varsovio 1888. Antaŭparolo represita en O. V.; ekzercaro represita sub titolo »Dua ekzercaro« (fakte ĝi estas la 1-a!) ĉe A. Paolet, 1921. — Aldono al la **Dua Libro**. (Esp.) ĉe Kelter, Varsovio 1889; fotografa reproduktajo, Centra Oficejo, Parizo 1925; represita en O. V. — **Plena Vortaro Rusa-Internacia** ĉe Kelter, Varsovio 1899. Represita de Kelter 1910. — **Meza Vortaro Internacia-Germana** ĉe Kelter, Varsovio 1889. Ĉiuj ĝis nun montritaj verkoj estas subskribitaj de la pseŭdonimo »D-ro Esperanto«. — **Artikoloj kaj tradukoj**, aperintaj en la gazeto »La Esperantisto« de 1889 ĝis 1895, estas kolektitaj, la artikoloj en O. V., la tradukoj en F. K., krom tiu de »La Batalo de P' Vivo«, aparte represita en Londono 1911. — **Universala Vortaro de la Lingvo Internacia**, (en ses lingvoj) Kelter, Varsovio 1893. Represita en la Fundamento. — **Ekzercaro de la Lingvo Esperanto**. Kelter, Varsovio 1894. Represita en la Fundamento. — **Hamleto**, tragedio de V. Sekspir, Tümmel, Nürnberg 1894. Represita de Hachette, Parizo ekde 1902 (oni atentu, ke kelkaj modifoj estis metitaj de L. de Beaufront. La preseraroj estas sufiĉe multaj, kaj ofte difektas la signifon aŭ la ritmon. La represo de la 1-a akto en la F. K. estas konforma al la unua eldono. Kritika studo en *Lingva Kritiko*. — **Granda Vortaro Ger-**

mana-Esperanta, Centralnaja, Odessa 1894. (Nur la 1-a kajero.) — **Fundamenta Krestomatio** (= F. K.) Hachette, Parizo, 1903. De Z mem estis verkitaj: **Ekzercoj** — **La Novaj vestoj de la reĝo** — **La Virineto de Maro** — **Anekdotoj** (plejparte) — **La hejmo de la metiisto** — **La karaj braceletoj** — **Bagateloj** (plejparte) **Fingra Kalendaro** — **El la poŝto** — **La loĝejoj de la termitoj** — **Kronika katara konjunktivito** — **El la unua libro de la lingvo E** — **Plena Gramatiko de E** — **Al la historio de la provoj de lingvoj tutmondaj...** — **Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia**. (tiu lasta traktajo estis aparte eldonita sub la nomo de Unuel, kun franca traduko de Beaufront kaj Vallienne, kaj antaŭparolo. Hachette, Parizo 1907.) **Aldonu al tio la anoniman poemon »Preĝo sub la Verda Standardo«** — **Wörterbuch Deutsch-Esperanto**, Möller und Borel, Berlin, 1904. — **Fundamento de E**. Hachette, Parizo, 1905. — **Kongresaj Paroladoj de 1905 ĝis 1912** estas kolektitaj, kun aliaj neoficialaj en O. V. Bonega kritika eldono de Sasaki kaj Iuaŝita, Japana E Asocio Tokio. 1920 (2a korekti'a eld. 1932) — **La Revizoro**, de Gogol. 1907. De tiu verko ĝis la »Readmono« ĉiuj menciitaj verkoj aperis unue, komplete aŭ parte, en *La Revuo*, poste en aparta eldono ĉe Hachette, Paris. — **La Predikanto**, el la Biblio 1907. — **Georgo Dandin**, de Molière. 1908. — **Ifigenio en Taŭrido**, de Goethe. 1908. — **La Rabistaroj**, de Schiller. 1908. — **La Psalmoj** el la Biblio. 1908. — **La Sentencoj de Salomono**, el la Biblio. 1909. — **La Rabeno de Baharāh**, de Heine. 1909. — **La Gimnazio**, de Alejhem, 1909 (ĉi tiuj du verkoj eldoniĝis, per unu volumo, nur en 1924, ĉe la Centra Librejo, Parizo.) — **Marta de Orzesko**, 1910. — **Proverbaro**, 1910. (La unuaj kajeroj estis eldonitaj de Kelter, Varsovio, 1905.) — **Genezo**, 1911. — **Eliro**, 1912. — **Levidoj**, 1912. — **Lingvaj Respondoj**, 1912. (Dua eldono, kompletigita, en 1913. Plena Kolekto, en 1925, ĉe

Centra Librejo, Parizo.) — Nombroj, 1914. — Readmono, 1914.

Je sia morto, en 1917, Z lasis, manuskripte, la kompletan tradukon de la Fabeloj de Andersen, kaj de la Malnova Testamento (el la Biblio). La Fabeloj aperis ĉe la Centra Librejo, Parizo (la volumo, 1923 — 2a, 1926 — 3a, 1932 — 4a, en presado) — sed kun teksto tre duba: la manuskripto estis laŭ mia konstato, en pluraj lokoj korektita de iu, kaj la preseraroj svarmas.

La Malnova Testamento aperis en la Biblio, eldonita en Londono, 1926, de la Brita Biblia Societo. La teksto estas la rezulto de longa kaj tre konsciencia laboro de angla biblia komitato super la Z-manuskripto: se oni komparas kun la Hachette-aj eldonoj, oni miros pri la nombro de la korektoj (605 nur en la 41 unuaj psalmoj!). Kiel ajn lojala kaj skrupula estis la revizio de la komitato, oni ne povas uziti tiun tekston, en ĝia nuna formo, por scienca studo al la Z-aj lingvo kaj stilo. Tio cetere nenion deprenas de la literatura graveco kaj fidindeco de tiu ĉefverko.

Ĉiuj aliaj malĉefaj verkoj de Z, liaj leteroj ktp. estis zorge kolektitaj en *Originala Verkaro de Zamenhof*, kompilitaj de J. Dietterle, Hirt & Sohn, Leipzig, 1929. (al kiu libro mi aludis per O. V.)

G. WARINGHIEN.

Zamenhof. Verkis E. Drezén. SAT, 1929, 49 p. Enhavo: Z-a jun-aĝo. La interna ideo. Zionismo. Religiaj konceptoj. Idealismaj kontraŭdiroj. Personeco. Lasta tragedio de Z. — La principoj de racia gramatiko kaj de int. vortaro. Z. kiel filologo. Kolektivismo en la kreado de la lingvo. Z kaj reformoj en E. Lingva unueco de E-istoj, ktp.

Zamenhofaj Vortoj. Radikoj uzitaj de Z kaj netroveblaj en la Universala Vortaro. Listo de tiuj vortoj: 1. en *Oficiala Gazeto*, n-ro 2., kaj 2. en verko de P. Boulet, 1908, XV kaj 75 p., kun franca, angla, germana, hispana, itala, rusa, pola traduko de 2126 radikoj.

Zamenhof-Radikaro, kun derivaĵoj

kaj fontindikoj, sub direkto de E. Wüster, prizorgita de P. Kirschke kaj liaj helpantoj, 1927, 84 p. »Ĝi listigas ĉiujn radikojn neoficialajn uzitajn de Z. Necesa laborilo en mano de niaj prilingvaj spertuloj kaj komitatoj.« (G. S., 'E', 1928, p: 8.)

Zamenhof Sofio, d-ro, filino de Z, kuracisto de internaj malsanoj en V. Helpadis multe al sia patro en la aranĝado de lia biblioteko, treege multnombra.

Zamenhof Marko, patro de Z instr. de lingvo franca kaj germana. Nask. 27 jan. 1837, mortis 29 nov. 1907 en Varsovio. Kavaliro de multaj ordenoj. Verkis multajn lernolibrojn rusingve kaj Frazologiojn seplingvan (rusa, pola, franca, germana, hebrea, latina kaj E-a).

Zauner (cauner) Josef (ps. J. Düa), germano, libristo. Nask. 18 nov. 1895 en Engelebrunn (Rumanujo). Fondis la UŜE-eldonejon en Leipzig, 1921 kaj depost tiu tempo estas inicianto kaj ĉefa laboranto por la UŜE-programo: Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo. Depost 1930 eld. kaj red. la gazeton UŜE-EHO, organo de la eŭropanismo en Timișoara. En 1932 fondis la Klubon de la UŜE-amikoj en R. Pro diversaj motivoj propagandas E-n kiel eŭropan lingvon. Verkis: »La elvojo UŜE«, 1923 (ankau germane), kaj »Der Weg zur Europa-Partei« (La vojo al la Eŭropa-Partio), 1931; »La Eŭropanismo«.

Zawada Johano, polo, o'icisto. Nask. 23 dec. 1891. Fakulo pri kooperativa movado. Ĉefa gvidanto de la klasbatala ES en Polujo »Laboro«. Fondinto kaj sekr. de E-a Eldon-Kooperativo. Vojaĝante tre multe, li aranĝis kursojn, referatojn kaj grupojn. Kursoj ankaŭ en gazetoj. Kolektis kaj eldonis 200 paĝan »Adreslibron de Polaj E-istoj« kaj Vortaron E-P-an. Tradukadoj kaj artikoloj en multaj E-gazetoj.

Zeidlitz (sejdlie) Otto W., svedo, paroĥa pastro en Pajala. Nask. 9 dec. 1860 en Lit. Unu el la pioniroj en S-ujo. Kunfondinto de EK en Upp-sala. Verkis por la unuaj E-gazetoj, tradukis. Al li apartenas la unua E-tradukajo el la sveda lingvo, aparte

elirinta: »La literaturisto kaj lia fianĉino«, de Flygare-Carlen, 1895, 24 p. Post la Ido-krizo li silentis.

Zelenka František, ĉeĥoslovako, poŝta sekr. en Praha, estrarano de la lando Bohemujo. Nask. 15 sept. 1890 en Tábor. Laboras en E-a katolika movado.

Ziermans Jan., nederlandano. Red. »Holandan Pioniro«, 1914—17. Kuntradukis »Akbar« de P. A. S. van Limburg Brouwer. Trad. la Koncertan Kantaron.

Zimmermann (cimerman) Oskar Edmund, sviso, komerca oficisto en Wien (fabriko de ledaj galanteriaĵoj). Nask. 2 nov. 1879 en Gebenstorf, Svisujo. Lernis E-n dum komercvojaĝoj, instruis en Frankfurt, fondis tie laboristan EG. Postmilita kunfondis ALLE kaj AED, estis prez. de ambaŭ Kas. de la 16-a UK, poste ĉesigis la agadon kelkajn jarojn. Nun kas. de EU en Wien.

Zipernovszky (cipernovski) Károlyné, hungarino, edzino de univ. prof. Mortis 1923 en Budapeŝt. Estrarano de HES antaŭmilita. Prop. precipe inter feministoj. Monsubteroj por la movado.

Zivanoviĉ Stevan, jugoslavo. Nask. en 1900. Prop-isto, gvidis kursojn, sekr. de JEL. Kunlaboras per originalaĵoj en ekster- kaj enlandaj gazetoj. En 1922 aperis de li »Mizerulo«, sociala rakonto, en 1934 granda J-E vortaro.

Zoffmann Peter, dano, urba ĉefkasisto en Kolding (de 1902—1920 instruisto). Nask. 25 jan. 1877 en Haderslev. Prez. de centralbiblioteko en Kolding. Kunlaboranto de verko pri Marx. Pergazeta propagando. Aŭtoro de lernolibro kaj E-D kaj D-E Vortaroj.

Zöldy (zöldi) István, hungaro, poŝta ĉefinspektoro. Nask. 26 dec. 1878 en Nagyigmánd. E-isto jam antaŭ la milito. Laboras precipe en katolikaj kaj poŝtistaj rondoj. Kunfond. kaj afergvid. vicprez. de H. Katolika ES, vicprez. de ILEPTO. Konstanta kunlab. per trad. kaj originalaj artikoloj en la ILEPTO-organo. Kunaranginto de la UK 1929.

Zon Wigbertus van, nederlandano, frato-instruisto. Nask. 22 marto 1869. E-isto de 1922. Fervore propagandis inter katolikoj kaj E-istigis centojn da personoj. Publikigis multajn prop. artikolojn kaj kelkajn broŝurojn. Gvidis kursojn. Membro de la ekzamena komitato kaj de la gazetar-servo. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio. L. K.

Zsámboki (jámboki) Mihály, hungaro, lokomotivgvidanto. Unu el la revivigantoj de HESL kaj ĝia prez. en 1924. Ampleksa laborado por E, precipe en la laborista grupo de Kiszpest.

Zschepank (ĉepank) Johanna, germanino. Nask. 14 dec. 1883 en Dresden. E-istigis en 1908. De 1911 laboris por la jus fondita Int. Unuiĝo de E-istaj Verkistoj. Ofte gvidis kursojn. Red. »G. E-isto« 1915—20. Siaj artikoloj, poemoj ofte aperis en E-gazetoj. Komence de 1924 prenis sur sin la gvidadon de E-ista Lit. Asocio kaj en 1924 fariĝis ĝia prez. L. K. de 1927.

Zsigmond (jigmond) Antal, hungaro, prof. Nask. 1868, mortis 1924. El gramatiko de Barabás aŭtodidakte lernis E-n 1898 en Fogaras. Propagando, kurso en Sopron, grupfondo 1912.

Zwach (cvaĥ), aŭstro-germano, kolonelo. Nask. 29 sept. 1856 en Teilsch (Ĉeĥosl.), mortis 21 marto 1928 en Wien. Fariĝis E-isto 1906 en Lwów. Estis membro de Int. Kuratora Komitato de IEMW, honora membro de diversaj E-societoj, LK. Lernis la Braille-skribon por korespondi kun blindaj E-istoj. Tradukis: »Poeziaĵoj« de Schiller; »Malŝparulo« de Raimund kaj »Altarbaro« de A. Stifter (manusk.), tekstojn en »Katolika Kantaro«, verkis multajn zorge pripensitajn, belstile skribitajn recenzojn en la aŭstria E-gazetoj. Li tradukis ankaŭ Z-ajn poemojn en la germanan lingvon kaj verkis originalajn poemojn.

Zwet (zvet) Hendrikus Bernardus van, nederlandano, sindikatana estrarano salajrita. Nask. 13 marto 1879 en Delft. E-isto de 1906. Kunfondinto de NKEL kaj ĝia sekr. en 1909—20 kaj 1925—28.

Zanoni, ps. de Pillath Friedrich, germano, eksficejestro ĉe firmo Krupp. Mortis 3 apr. 1932 en Essen. Antaŭmilita la animo de la E-movado en Rejnlando. Estis kunlaboranto de »E Triumfonta« kaj de la E-Instituto por la G Respubliko. Estis majstro en la buŝa kaj skriba uzo de E. Tradukis tri verkojn de Heine: »Elektitaj

poemoj«, 1914, kie estas kolektitaj la plej rimarkindaj poeziaĵoj de la poeto; »Atta Troll«, somernokta sonĝo, 1925; »Elektitaj Prozaĵoj«, 1930. La tradukoj estas zorge faritaj, li ĉiam akcelis la modeleon de la stilo. Kompilis: »Germanaj Kantoj E-igitaj«, el kiuj grandaj parton li mem tradukis. HILDA DRESEN.

ALDONO

Ruslando. La unua E-a lernolibro aperis en rusa lingvo. Ankaŭ la unuaj E-istoj estis rusoj aŭ ruslandanoj. En la unua adresaro, el la unua milo de E-istoj pli ol okcent estis rusoj. Specialaj soci-kondiĉoj de Ruslando kaŭzis, ke en la reakcia carista lando vaste ekfloris kaj trovis komprenon la internaj ideoj de E. La inteligentularo de tiu lando en longa persista batalado kontraŭ la carismo kaj kontraŭ obskurantismo ĉiuspeca — facile entuziasmiĝis por la noblaj homamaj ideoj de Z. En plua formigo kaj fiksigo de tiuj ideoj la unuaj tempaj rusaj E-istoj ludis gravan rolon. Tiuj iliaj meritoj estas konfesataj de ĉiuj historiistoj de E. La rusoj donis el sia anaro la unuajn verkistojn. Ili kreis la unuajn literaturajn verkojn. En Ruslando troviĝis plej unuaj, fervoraj propagandistoj.

De Waal, Lojko, Kofman, Evstifejev, Devjatnin, Borovko, Gernet estas nomoj intime ligitaj kun la unua epoko de E. Ĉiuj unuaj libroj en kaj pri E aperis en Varsovio sub severa observo de cara cenzuro. Administraj baroj tamen treege ĝenis starigadon de iu organizita ruslanda E-movado. Vere jam en 1891 aperis grupetoj en Moskvo, Saratovo kaj en aliaj lokoj. Sed legale organizi tiuj grupetoj ne sukcesis. Same ne estis ebla iu regula eldono de E-a literaturo kaj de E-aj gazetoj. Nur en 1892 en Peterburgo oni sukcesis legitimi societon »Espero«. Ci-foje la afero sukcesis ĉar pri permeso de la societo petis kelkaj eminentuloj, kiel administranto de la cara vintra palaco Kanaloshy-Lefler kaj favorata en ministraraj rondoj skulptisto Mikešin. So-

cieto »Espero« ricevis permeson fondi siajn filiojn en diversaj urboj. Tamen manko de libera eldonagado kaj rigora observado flanke de polico kaŭzis, ke ankaŭ post tiam la plej granda parto de rusaj E-istoj restis ne unuigitaj en iu komuna organizo.

En sia verko »Historio de Esperanto« E. Privat konstatas altan socialan idealismon, kiu ligis la unuajn rusajn E-istojn al E. Tiu idealismo kaŭzis starigon de pli intimaj rilatoj kun movado iniciatita de granda verkisto grafo Leo Tolstoj. Tamen tuj post kiam en 1895 aperis en Nurnberga gazeto »Esperantisto« (sola tiutempa gazeto) artikolo de Tolstoj, la gazeto estis malpermesita en Ruslando kaj ĉar la plejmultaj de ĝiaj abonantoj estis rusoj — tio antaŭdifinis ĝian ĉeson. De tiam kaj ĝis 1905 en Ruslando ne aperis eĉ unu E-a eldonaĵo krom la ripetaj eldonoj de verkoj jam antaŭe publikigitaj kaj de cenzuro permesitaj. Ĉe tiuj kondiĉoj la societo »Espero« kun multaj siaj filioj apenaŭ vegetis. Nur en 1905 jam post komenciĝo de unua rusa revolucio d-ro Ostrovskij en Jalta ricevis permeson eldoni gazeton »Esperanto«. Iom pli malfrue similan permeson ricevis ankaŭ la societo »Espero«, kiu komencis eldonadi revuon »Ruslanda Esperantisto«. En tiuj jaroj ankaŭ aperis la unuaj libroj E-aj eldonataj en Peterburgo. Apud la pasivema societo »Espero« de 1907 funkciis la societo »Esperanto« unuiginta la pli aktivajn junulajn E-istojn. Gravan servon al propagando faris populara rusa revuo »Vestnik Znanija« (Heroldo de sciencoj), kiu dum unu jaro presigis vastampleksan al-

donon »Espero«. Ĉe la fino de 1908 la societoj »Espero« kaj »Esperanto« unuiĝis sub la nomo »Ruslanda Ligo Esperantista«. Kiel prezidanto de la Ligo estis elektita A. A. Postnikov. Ĉirkaŭ tiu tempo en la tuta lando komenciĝis pli organizita movado. Aperis multaj grupoj kaj societoj ne nur kiel filioj de la Ligo, sed ankaŭ memstare. La ligo havis je la komenco de 1911 proksimume 30 filiojn kun ĉirkaŭ 900 membroj. Samtempe ekzistis ankoraŭ iom pli granda nombro de diversaj urbaj memstaraj societoj, kiuj evitis organizan kuntandiĝon kun la Ligo, ĉar opiniis ĝin tro oficiala. Vere Postnikov klopodis ĉiel ĉe ministroj kaj eĉ ĉe cara familio por gajni favoron al E. Li ne multe en tio sukcesis. Same kiel ĉe kreo de nova organizo »Universala Ligo«, kiun li intencis prezenti al la propagandaj servoj de la rusa cara registaro. Fiasko por la Ligo okazis en komenco de 1911, kiam Postnikov estis arestita pro spiona agado favore al Aŭstrio. Postnikov estis kondamnita kaj la Ligo kun ĝiaj filioj fermata. Fermata estis ankaŭ la »Universala Ligo«. Tiam montriĝis bonŝanco, ke ne ĉiuj rusaj E-aj societoj estis filioj de la Ligo. Pro tio E-a movado daŭris ekzisti sub certaj organizaj formoj. La unua E-a kongreso en Ruslando estis kunvokita en 1910 en Peterburgo de Postnikov, sed la kongreso estis bojkotita de parto de rusaj E-istoj. Cetere ĝin partoprenis ankaŭ Z. En 1909 kreiĝis nova centro — eldonejo kaj librejo »Esperanto« en Moskvo kaj la gazeto »La Ondo de Esperanto«, ambaŭ iniciatitaj de A. A. Saĥarov. Nur iom post iom la registaro komencis allasi formiĝon de novaj societoj. En 1913 en Peterburgo estis restarigita la societo »Espero«. En la sama jaro en Kiev okazis la dua kongreso de rusaj E-istoj sub prezido de kapitano Iljaŝeviĉ. Generale la rusa E-movado montris antaŭ la mondmilito ŝancojn plivigliĝi. La milita eksplodo kaŭzis, ke same kiel en aliaj landoj la progreso de la movado estis haltigata. Ankoraŭ kelkajn tagojn antaŭ la Februara revolucio en 1917 la registaro trovis ne celkonforma la eldonadon

de E-a gazeto en Peterburgo por kiu klopodis aro de petrogradaj E-istoj. La kunvoko de la tria kongreso estis prokrastata ĝis la fino de la milito. Ne sukcesis tiam ankaŭ provoj pri iu plia alcentrigo de ekzistantaj E-aj fortoj. Ĉi-tiun problemon solvis jam la E-istaro en Sovetio.

Sovetio. La E-a movado en Ruslando estis liberigita el katenoj de cenzuro kaj polico post renverso de la cara reĝimo en februaro 1917. Tamen la daŭranta milito kaj politikaj kaj socialaj tumultoj daŭris ĝeni disvolvon kaj disvastigon de E. Ne malpli ĝenis ĝin ankaŭ diversaj ekonomiaj mankoj postmilitaj. Malgraŭ tio tuj post la Oktobra revolucio de 1917 montriĝis konsiderinde granda nombro da E-istoj kaj konsiderinda ilia persisto. En 1918—19 ekzistis ne malpli ol 100 E-aj societoj kaj grupoj sur sovetia teritorio. Preskaŭ saman nombron atingis diversaj hektografiitaj gazetoj, kiuj anstataŭis la mankantan centran organon. Pasioj politikaj kaj klasa antagonismo malantaŭenpuŝis problemojn kulturajn, malpli gravajn. Inter ili ankaŭ E estis malententata. Certe estis eĉ politikaj organizoj, deklarintaj sian simpatian por la lingvo internacia, sed la kruda realaĵo instigis la popolajn tavolojn kaj la registaron zorgi pli pri milito, pri pano kaj karbo ol pri E.

Dum pezaj jaroj 1917—21 la neorganizita ruslanda E-istaro daŭris ekzisti, daŭris dorloti sian lingvon, esperante, ke tiu lingvo ĉe internaciaj tendencoj de la nova revolucia registaro siatempe trovos akcepton, komprenon kaj favoron. Kelkaj koncernaj administraj decidoj kaj agoj de lokaj ŝtataj kaj politik-partiaj aŭtoritatoj kvazaŭ promesis pravigon de tiuj atendoj. En 1921 dum la 3. Tutruslanda kongreso de E-istoj estis proklamata la fondo de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU). Sed la malfacila ekonomia situacio, multkomplikaj politikaj problemoj — ĉu enlandaj, ĉu eksterlandaj — multe ĝenis la movadon kaj ne permesis, ke la ŝtato aŭ vasta publiko komencu pli serioze okupiĝi pri la lingvo internacia. Nur en 1925 komenciĝis la ŝanĝo de la situacio. Tiujare la aŭtoriti-

tataj institucioj proklamis neceson de starigo de konscie gvidata int. eduklaboro por la laborulaj amasoj. Tiu eduklaboro ne estis efektivebla sen int. korespondado. Por int. korespondado necesis lingvo. Kaj siajn servojn al la vasta publiko proponis la E-istoj. Laboro, kiun ili faris ĝis tiam nur por si mem, fariĝis nun publika bezonaĵo. Granda parto de korespondadoj interŝanĝataj estis en E. Tio tiris atenton de la aŭtoritatoj al E kiel al atentinda kultura faktoro. Kiam en 1928 kun kresko de tiu int. kulturkleriga laboro estis proklamata la neceso, ke ĉiu laborulo studu fremdajn lingvojn por tiamaniere povi pli intime ligiĝi kun eksterlandanoj — ree estis la sovetiaj E-istoj, kiuj atentigis la aŭtoritatojn kaj la publikon pri E. La E-istoj ne pretendis, ke la laborularo studu E-n anstataŭ fremdaj lingvoj, sed ili konstatis multoble pli facilan ellernon de E kompare kun fremdaj lingvoj naciaj kaj ili atentigis, ke E-studo estas ŝatinda ponto por pli facila, pliposta ellerno de aliaj lingvoj eŭropaj. Tia taktiko estis plej efika. En multaj lokoj diversaj aŭtoritatoj — ĉu ŝtataj, ĉu sindikataj, ĉu partiaj — komencis subteni E-movadon, helpi al ĝia gvidado kaj organizado. La movadon prenis sub kontrolo kaj gvido jam ne izolaj aŭtoritatoj, sed certaj publikaj vastamasaj institucioj. Dum 1921-28 SEU sukcesis venki multajn barojn kaj atingi la necesan organizitecon kaj unuecon en la sovetia E-a movado. Dum tiu sia agado SEU havis diversajn kontraŭulojn, kiuj iom post iom estis aŭ forigitaj aŭ ensorbitaj de SEU. Ankorau en 1921 dum la tria tutruslanda kongreso la iniciatintoj de SEU devis batali same kontraŭ ekstermuloj dezirantaj vidi SEU pure komunista organizo kaj kontraŭ reprezentantoj de »liberecana« E-ismo, kontraŭantaj ĉiun centran organizon. El 160 partoprenintoj de la tria kongreso estis 20, kiuj forlasis la kongreson pro sia malkonsento kun SEU-programo celinta centralize unuigi ĉiujn E-istojn de la lando, por poste efektiviĝi ilian socian reedukon sur bazo de sovetismaj principoj. Ankaŭ post 1921 restis pluraj orga-

nizoj kvazaŭ bojkotantaj SEU. Nur post la unua kongreso de SEU (en 1923 en Moskvo) aliĝis al SEU la eldonejo »Nova Epoko«. Nur en 1925 estis garantiita regula aperado de SEU-gazeto. La kongresoj de SEU okazis: la dua en 1925 en Moskvo, la tria en 1926 en Leningrad. Tiutempe jam estis plene klara la programo de praktika agado de sovetia E-istaro. Malkontentuloj kaj malkonsentuloj pounuope foriradis de SEU, sed anstataŭ venis novaj grupoj kaj ĉeloj en fabrikoj, uzinoj, laboristaj kluboj ktp. La kvara kongreso de SEU (en Moskvo, en 1928) povis konstati venkon de SEU-principoj kaj akceptis ellaboritan de E. Drezen tezonon pri kolektiva kreo kaj evoluo de la lingvo. Estis kvazaŭ lingva teoria aldono al la tezo de la praktika agado akceptita en 1921 kaj konfirmita de la postsekvantaj kongresoj. La kvina kongreso okazis en Moskvo en 1931. Ĝi reesploris la statuton de SEU, aldonis al sia nomo subtitolon »Tutunia Asocio de amikoj de la lingvo internacia« kaj konfirmis la okazintan skismon kun SAT, kiu akceptis kritikan pozicion rilate al la ortodoksa marksismo. Ĉe nuna tempo (fino de 1934) SEU havas registritajn 8930 membrojn. Organiza skemo de SEU estas — Centra Komitato, respublikaj kaj provincaj komitatoj, urbaj komitatoj, ĉeloj kaj grupoj en fabrikoj kaj kluboj ligitaj kun koncernaj komitatoj. Dum la lastaj jaroj streĉo de la ekonomiaj fortoj de la lando efektiveganta sian unuan kvinjarplanon kaj efektiveganta la duan kvinjarplanon, kaŭzis, ke E estis atentata kaj subtenata nur en tiuj lokoj kaj fakoj, kie ĝi povis praktike servi al la celoj starigitaj antaŭ la lando.

Estas konsiderinda fakto, ke en 1920—28 la problemon pri int. lingvo pritraktis lingva sekcio de sovetunia akademio. En 1931 detalan rezolucion pri perspektivoj de int. lingvo akceptis Moskva Instituto de Lingva Scienco. Dum sia ekzistado SEU eldonis pli ol 200 librojn pri kaj en E. Inter ili proksimume 60 libroj estis eldonataj sub aŭspicioj de SEU en eldonejo »Ekrelo«.

SEU havas kvin pagatajn laborant-

ojn. Plej gravaj agantoj en la Centra Komitato estas Drezen, Demidjuk, Incertov, Modenov (ĉiuj en Moskvo). Inter alia aktivularo de SEU notindaj Bezin, Erjuhin, Filippov, Gavrilov. Javoronkov, Izgur, Kolĉinskij, Lisiĉnik, Miĥalskij, Muravkin, Podkaminer, Rublev, Samojlenko, Snejko, Spiridoviĉ, Svedova, Zamjatnin.

Biografioj, alvenintaj post apero de la unua volumo:

Blinov Jevgjeniv Vladimiroviĉ, ŝtatoficisto en Moskvo. Nask. 6 jan. 1906 en Leningrado. E-isto de 1927. En 1930 fariĝis membro de SEU-estraro. Tradukis al E la romanon »Submaristoj« de Novikov-Proboj. En aŭg. 1931 edziĝis je sia E-ista korespondantino el Budapeŝt, Klara Maitinsky, nun instruistino de la fortepiano kaj germana ingvo en Moskvo.

Cywinski Ryczard, polo, arkitekto. Nask. 1884. E-isto de 1908. En 1917 en kunlaboro kun T. Sikora li publikigis »Manifeston de socialistoj-E-istoj«, kun la devizo: Socialistoj de ĉiuj nacioj unuiĝu per E, Amo kaj Racio! Malgraŭ ke estis anoncita Tutmonda Ligo de Socialistoj E-istoj kaj eĉ fondita unua grupo en Petrograd, la »seismo« ne progresis.

Eydelnanth Joseph, d-ro, pedagogo. Fariĝis E-isto dum sia restado en Svislando kaj Franclando (1904—12). Fondis en Lausanne Universalan Studentan Union kaj lab. grupon de »Libera Penso«. En 1909

korespondis kun L. Tolstoj kaj ricevis de li manuskripton »Raporto pri paco«, kiun li presigis en E-traduko en Int. Socia Revuo. Post la milito li laboris en Nord-Kaukaza lando pri lerneja higieno en urbo Grozny.

Jeltov Nikolaj Matvejeviĉ. Nask. 8 nov. 1895, mortis pro tifo 9 majo 1920 en Moskva. Treege aktiva, multon promesinta E-isto. En 1917 sekr. de OKTEF, en 1918—19 prez. de Moskva ES. En 1919 kune kun V. Polakov multe laboris en la E-biblioteko de Davidov super la Bibliografio de la E-a literaturo. Tradukis el L. Tolstoj, L. Andrejev, A. Ĉeĥov k. a.

Jirkov Leo Ivaniĉ, prof. de lingvoscienco, specialisto pri persa kaj kaukazaj lingvoj (avara k. a.). Nask. 1885. E-isto de 1902. Aŭtoro de rimarkinda broŝuro (en la rusa kaj E) »Kial venkis E« (v.). En sia alia verko »Al la nova etapo« li klare elmontras la veran internaciecon de E rilate al la lingvoj aziaj, afrikaj ktp.

Jukov Inokentij Nikolajeviĉ, pedagogo, fama skulptisto. Nask. 1877 (?) en orminejoj de Nerĉinsk (Siberio). Unu el la iniciatintoj de skoltismo en Ruslando, kaj tiu de la nova revolucia junpionira movado. E-isto. Li menciis E-n en siaj verkoj.

Noto. Post longa vana atendado de la manuskripto de nia kunlaboranto rusa, — tiun ĉi historian trarigardon verkis rusa kompetentulo.

INDEKSO

a, Laŭ personoj:

Biografietoj de malmultaj Esperantistoj ne povis esti metitaj en abocavico de la artikoloj; en la nomitaj kazoj ni signis la paĝon per cifero post la nomo. La dikaj ciferoj en krampoj montras la bildo(j)n de la personoj.

Aŭstraliao : Banham, Hyde (255), Pyke J., Pyke L., Rawson (447), Thomson.

Aŭstrujo: Bartel (58), Bernfeld (60), Biehler, Blaas, Braun, Buxbaum, Casari, Cech (125), Chiba, Christanell (115), Dietl, Flasch, Franz, Frey (196, 625), Fried (197), Fuchs, Gasperini, Geier, Goldmann, Haas, Hackl Hainschegg, Halbedl, Hartwich, Hasenöhrl, Hawlik, Horneck, Hoschek, Hovorka (252), Jeitler, Jokl (20), Jungschaffer, Kaftan, Klečka, Klein, Kühbacher, Lidl (21), Macho (20, 347), Mair (349), Maschl, Meisleder, Mestan (20, 21, 367), Minibeck, Mraz, Mudrak, Myslik, Pettera, Pezleederer, Pfeffer (432), Rogler, Schade (21), Schamanek (20, 21), Schauhuber (470), Scheibenreiter, Schiebl, Schöpfer, Schröder (20, 480), Schumann, Seidl (485), Selzer, Siedl, Simon (20, 494), Smital (20), Sós (502), Steiner (20, 269, 510, 625), Steinhauer, Stengel, Struska, Taussig, Vasta, Wannek, Watzinger, Weinhengst (562), Werber, Werner, Wollmann (20), Wüster (567), Zimmermann (21), Zwach (21, signita per 5).

Belgujo: Biest-Andelhof, Blaise P. (70), Chapelier, Cogen (117), Jamin (276), Jaumotte, Karnas, Landenne, Melckebeke, Nyssens, Petiau, Richardson A., Schoofs (478, 624), Schoor (479), Vermandere, Vermuyten.

Brazilo: Backheuser (30), Baena, Baggi ... I., Baggi ... J. (32), Beltrao, Bloomfield, Braga, Camosato, Coutinho, Couto Fernandes (178), Domingues (151), Fernandes, Geyer, Gonzaga, Keating, Kraemer, Leite, Melo e S., Mota M., Pais, Porto C. N. (438), Schmitz, Silva.

Britujo kaj Irlando: Adams, Alexander, Anderson E., Anderson J., Applebaum (13), Ashby, Ashley (17), Bailey H. T., Bailey T. G., Bailey W., Ballard, Baxter, Beveridge, Bicknell (41), Blackett Blackham, Blaikie, Blaise M. (69), Blaise P. (70, 610), Blake, Boatman, Booth (77), Boutwood (87), Briggs, Brown, Browne, Buchanan G., Buchanan J. (96), Bullen, Burn, Butler M. C. (105), Butler T. R., Buxton, Cameron, Caw, Cecil, Chitty, Clark, Collinson (119, 610), Cosmetto, Cox, Crowley, Currie, Curry (128), Davis, Dickinson, Durrant, Edmonds, Eliot, Elliott, Ellis E., Ellis J. (163), Fairbairn, Fairman, Findlay, Flower (191), Flugel, Gale, Garbutt, Geoghegan (213), Gething, Gillette, Goldsmith (220, 610), Gordon, Griffin, Guéritte (228), Hanbury, Harrod J., Harrod M., Harvey, Haxton, Hayes, Hayton, Henderson, Hill, Hipsley, Hirst, Hogg, Holmes (249), Hookham, Höveler (129), Howard, Hyams (256) Iddon, Johnson E. B., Johnson W. B., Johnston, Kearney, Kyffing-Taylor, Lambert, Lawrence E., Lawrence W., Leakey, Ledger, Lishman, Lloyd, Long (343, 610), Luyken

(346), Lyndridge, Macauley, Macfarlane, Marriott, Matthews P., Matthews W., Mawson, Mayor, McCormick, McFadyen, Megahy, Merchant (367, 610), Merrick, Millidge (382), Morrison, Northshed, Moschles (390), Motteau, Mudie (392), Murgatroyd, Murray, Nash, Newell (399), O'Connor, Osmond (419), Padfield, Page (423), Peckover, Phillimore, Phillips, Pickard, Pointer, Pollen (437), Primmer, Rhodes F., Rhodes J. (449), Richardson A., Richardson E., Roberts, Robertson (452, 610), Robinson, Rodger, Rook, Roome (455), Roscoe, Rowe, Rust, Satchell, Schafer, Scougal, Senior, Severn, Sharpe, Shaw, Smith, Solomon, Southcombe, Starr, Staveley, Stay (507), Stead, Stevenson, Stewart, Stuart-Menteh, Sturmer (514), Styler, Sutherland, Thomas (532), Thomson (533), Tredgold, Tullo, Wackrill (555), Wadham, Warden (557), Westcott, Westmancote, Wight, Willcocks, Wright, Yarworth, Yeiland E. (568), Yelland T. (568).

Bulgarujo : Aktargiev (6), Arnaudov, Atanasov D. A. (18), Atanasov G. (19), Bogdanov, Conev, Fadenhecht, Gavrijski, Georgov, Grigorov, Hitrov, Haralambev, Hesapčiev, Hrima, Hristoskov (263), Kanev, Kolev, Krestanov (311), Ljubin, Malčev, Mineev, Minkov (378), Mladenov, Nikolov, Oreškov (421), Petkov (431), Pjееv, Popov, Rjaňovskii, Sapunčiev, Silvestriev (493), Simeonov, Šišmanov (522), Tričkoff (541).

Ceĥoslovakujo : Austerlitz, Bartošik, Bárth, Berger (53), Bischitzky (49), Bouška, Buhr (167, 609), Burgemeister, Csáder, Čejka (130), Dandová, Eiselt, Eltschkner (167 609), Filip, Fridrich, Friedrich, Ginz (223), Grna, Heikenwälder, Hromada, (253, 624), Janalíková, Jukl, Kamaryt (288), Kesik, Kilian (289), Kozeny, Kraus, Krisl, Krumphole, Krysta, Kudeřa (313), Kühnl (314), Lederer (329), Lorenz, Lukáš (345), Macan, Machaček, Nastny, Moder, Neuzil (398), Novák, Pitlík (437, 666a), Pontz, Procházka, Rebiček, Reininger, Rosa, Rosický, Schneider, Scholze G. (477, 624), Scholze L., Schulhof (481), Sklenčka (495), Sklenčková, Slavik, Smetak, Stejskal, Strejčkova, Samla, Škarvan, Šupichová (525), Šustr (526), Tarantíková, Taubmann, Ullrich, Vondroušek, Wanitsek, Zelenka.

Ĉinujo : Hsu, Kenn (301), Lu, Naŭu, Šifo (491), Sinpak, Wu.

Danujo : Andersen, Bøgh-Hogsted, Christensen, Dueholm, Ege, Friis, Gödecke, Hansen H., Hansen K., Heilskov, Hvorslev (254), Jørgensen, Mikkelson, Neergaard, Noll, Packness, Palsberg, Schröder, Sievers, Skeel-Giørling (496), Thomsen, Zoffmann.

Estonujo : Adamson, Ariste, Arvisto, Blaufeldt, Brauer, Dresen He. (155), Dresen Hi. (156), Eik, Ernits, Gutmann, Jaanisto (275), Jiik, Kauer, Kuitman, Lübek (344), Miss Esperanto (380), Pähn (424), Pung, Rahamägi, Rikand, Rosenberg (456), Ruus, Sakaria, Seppik (487), Stahlberg, Tennison, Tünn, Vaher (546), Vahtkerl.

Finlando : Anttila, Ekström, Frenckell (195), Haartman H., Hall (233), Jalava, Koivu, Kostainen, Laiho, Lappi, Ojala, Ramstedt (446), Salokannel (467), Setälä (490), Tamminen, Thilander V.

Francujo : Agache, Agourtime, Aisberg, Aizière, Archdeacon (15), Artigues, Avril (26), Aymonier (27), Baire, Balliman, Banmer, Barbusse, Barthelmess (42), Bastien (43, 624), Baudet, Bayol, Beaufront (45), Beaumel, Bel, Belhoste, Bergie's, Berthelot (54), Blangarin (50), Bobin, Boirac (74), Bonnet, Bord, Borel E. (78, 576), Boucon (82), Boulet (72), Bourlet (84), Bouvier, Bréon, Bricard, Briquet, Brunet, Cachon (112), Capé (106), Carles, Cart (110.a, 113), Cense (111), Champion, Chaussegros (113), Chavet (114, 86), Chillard, Colas (118), Corret (120), Cotton (121), Courinat, Couteaux (122), Couturat, Cozic, Cresp, Decourt, Degon, Dejean (145), Deligny (146, 589), Delmas, Demarcy, Demarest, Deshays, Dor (152), Dore, Drudin, Dubois (159, 624), Duchochois (85), Dupuis, Durieux (161), Duval, Duviard, Esselin, Evrot, Eyquem, Farges, Fauvart-Bastoul L., Fauvart-Bastoul M., Fauvart-Bastoul L., Favrel (176), Ferez (177), Filliatre

P. (180), Filliatre R. (181), Flageul (188), Flourens (190), Fruictier (198), 113), Gabert, Gallois, Gasse, Gautherot, Giroud, Glodeau, Godart, Grenkamp (227), Grosjean-Maupin (230), Guadet, Guérineau, Guéritte (228), Habert (231), Houbart (251), Huet, Humez, Jadot, Jammes, Javal (280), Lacroix, Laignier, Laisant (323), Lajarte (324), Lambert (325), Lanti (326), Larroche (327), Le Cornec, Lefebvre (331), Lemaire (333), Lombard, Louis, Marchand (355), Maresquelle, Matton (358), Menu de M. F. (364), Menu de M. S. (366), Méray (367), Merckens, Mesny, Mayer (370), Michaux (85, 86, 371), Milsom, Mistler (381), Mittey, Moch (384), Moissenet, Mouton, Muffang, Nels, Noël (403), Offret (413), Peltier (429), Petit (430), Pichon, Polgár I., Polgár V., Pouchot, Pujot, Ramboux (445), Richard, Richet (459), Rienzi, Robert E. (431), Robert Eü., Rodet, Rollet de l' Isle (454, 624), Rousseau C. (461), Rousseau T., Roux A., Roux E., Roux M., Royer, Schwartz A., Schwartz R. (483, 602), Sebert (484), Sentis (486), Soubranne, Tenneson, Thévenin, Tiard (534), Vallienne (547), Vanverts (548), Verax (113), Waringhien (558), Warnier (560), Zabilon (569).

Germanujo: Arnhold G., Arnhold H., Barthelmess (42), Bässler, Becker, Behrendt (46), Bennemann (51), Berger (239), Borel Jean (79), Borel Jules, Boxhammer, Briegleb, Bünemann (103), Burger, Butin (104), Christaller (107), Degen, Deubler (148), Dietterle (149, 624), Döhler, Döring, Eberler, Ebner (162), Einstein (165), Ellerbeck, Ellersick (166, 624), Elten, Engst, Epstein (169), Fast, Flatauer (189), Foehr, Förster, Frenckell (195), Funken, Glück, Gödecke, Göhl (221), Goldberg, Habellok (232), Haefker, Hahn, Hanauer, Hankel (238), Hechtl, Heid, Heinze, Hübner, Hübricht, Istel, Jahns, Jung (287, 239), Jungfer, Junker, Jürgensen, Karsch (290), Kätzler, Klemm, Kliem, Kliemke (292), Köppen, Kötz (308), Kraner, Kreuz (312, 138b), (610), Kunowski (722), Küster, Ladevèze (321), Ledermann, Lerchner, Liebeck (337), Linse, Lippmann (340), Loy, Mahn, Mally, Markau, Meier (365), Minor (379), Möbusz (383), Mölke, Müller, Münz, Murath, Mybs (394), Naumann, Neupert, Omlor, Orthal, Ostwald, Patzelt, Pillath (579), Plehn, Puff (441), Ranft, Reinking, Remers, Renn, Riedel (450), Rockmann (460), Schatlat, Schauerhammer, Scheibler, Schlaf, Schmalzl (475), Schmidt A., Schmidt C., Schmidt R., Schneller, Schönherr, Schramm, Schwartz A. (482), Sievers, Sohrmann, Solzbacher (501), Sprotte, Steche A., (508), Steche T., Tarnow (528), Teuchner (nur klišo, 527), Trögel (542), Trompeter (543), Tuschinski (138c, 544), Velten, Vogt (553), Wallon, Walter (556), Wermke, Wetekamp, Wildebrand, Wingen, Wunderlich, Zschepank (583).

Grekujō: Konstantopoulos (396), Manoussou, Patsuris (427), Polizoidis (435), Spatharis (503), Stamatiadis (506).

Hispanujo: Aguilar B., Alberich J. (7), Aguilo V., Aiza, Albagés V., Alomar, Alonso (12), Amades, Anglada, Artigas, Azorin (28), Barcelo Andreu (40), Barcelo Caimari, Bofill (73), Bosque, Bremon Masgrau, Capdevila (109), Carbonell, Carro, Casanova, Cases Martin, Codorniu (115), Comella, Cortezo, Dalmau (137), Diez, Domènech, Duyos S., Esteban, Font Cantalpos, Font-Giral (192, 582, 609), Garzón Ruiz (212), Gaston, Gili-Norta, Gorgues, Grau-Casas Jaume (225), Grau-Casas Josep, Guinart, Guittart Janer, Inglada (265), Jofre, Julivert A., Llinás B., Loira J., Mangada R. (353), Mannez S., Maraury B., Martinez A., Maynar, Mojado, Novejarque, Núñez, Oliván H., Perogordo, Pino (433), Pratedesapa, Pujolá i V. (442), Rabassa, Redondo (448), Rodellar-B., Rosals, Sabadell (452), Sardà-S., Soler, Soriano, Terricabras, Vila, Villanueva.

Hungarujo: Altenburger, Ámon, Austerlitz, Baghy (33, 595, 601), Bálint, Balkányi (36, 257, 624), Bánó (37, 65), Barabás, Baranyai (38), Batta, Benárd, Berki (258), Bieier (71, 595), Bodó (83, 595), Buljovszky, Csáder, Csánó, Cseh (123, 614, 624), Czitrom, Dévay, Farkas, Fiedler, Forster, Frühwirth, Fuchs, Galambos, Geiger, Giesswein (219, 257), Halász, Halka

(234, 595), Hugai, Izsó, John (208, maldekstre antaŭe), Joó (258), Kalocsay (296, 298, 595, 703), Karczag, Karinthy (297), Kéthelyi, Kiss, Klein, Kókai, Kökény (304), König, Kovács, Kozma, Lajos, Lengyel (113, 334), Lombos, Loránd (257), Luczenbacher, Lukács György, Lukács Gyula, Major (350), Marzell, Marich (360), Mátyás (258), Medgyesi Mezei, Mihalik, Miletz (377), Nagy, Nagy-Molnár, Patai (257, 426), Pázmány (428), Polgár I., Polgár V., Rácz, Rajczy (443), Rhorer, Robicssek, Sáróssy, Schatz, Schuller, Schwartz, Simonyi, Sós (502), Spierer, Steiner, Sussmuth (515), Szentmáry, Szilágyi F. (517, 595), Szilágyi J., Takács (257, 526a), Tholt, Tieder (435), Tihanyi, Tolnai E. (536), Tolnai P. (537), Tomán, Török (539), Tóth, Totsche (540, 595), Turzó, Ungár, Vikár, Vörös, Wanitsek, Zipernovszky, Zöldy (581), Zsámboki, Zsigmond.

Italujo : Alessio, Arabeno (14), Bagnulo (34), Barni, Bianchini, Bickneli (41), Bodini, Cacciapuoti, Campanile, Canuto, Carolfi (109a), Cesarini, Clavenna, Darberi, Dottarelli, Facchi (175), Gallois, Ghezzo (215), Giambene (218), Grazzini, Junck, Lacialendola, La Colla (320), Laurenti, Marchesi, Marignoni (356), Mazzolini (359), Migliorini B. (373), Migliorini E., Minnaia, Montezemolo (385), Musella, Nalli, Orengo (417), Peri, Reni, Saggiori (463), Savia (296), Schmucker, Stellaci, Stromboli (624), Tellini (539), Toschi, Vaona.

Japanujo : Abiko 409, Aibara (5), Aizaŭa 409, Akigi 409, Akita (409), Alexander 409, Asada E. 409 (411), Asada H. 409 (408), Asai, Baba 409, Chif 409, Cujuki 409, Deguči (144), Dick 409, Eguči 409, Fujisaŭa, Fukuta 409 (410), Ga 409, Gauntlett 409, Gotoo 410, Hajami, Hajaŝi 410, Havasi 410, Harada 410, Hasegaŭa R., Hasegaŭa T. 410 (412), Hikosaka 410, Hirano 410, Hori, Iida, Inoue M., Inoue S. 410, Ishiguro (274), Ito E., Ito S., Itoo, Iŭaŝita, Iwahashi 410, Izumi 410, Jamaga 410, Jamanaka 410, Joŝino, Jui 410, Juri, Kajaba, Kaji (295), Kato, Katoh, Kawahara, Kawasaki (309, 663), Kidosaki, Kijomi, Kim, Kizaki, Kobajaŝi M., Kobajaŝi T., Kondo, Kroita, Kurachi, Kurijama (315), Kuwahara (318, 663), Macuda, Macuzaki, Maeda, Major (350), Manzaŭa (nur klišo, 354), Matuba, Micuiŝi (372), Mijake H., Mijake Ŝ. (376), Minoda, Miŝima, Motono. Muramoto, Murata, Muto, Nogata, Nakagaki, Nakahara, Nakamura (395), Nakaniŝi, Nakano, Narita, Nishi (400), Niŝida, Niŝimura (401, 624), Nitobe (402), Nohara (404), Oba, Ogata, Ohaŝi, Ohshima, Oishi (414), Oka A. (415), Oka H., Okamoto (416), Oohaŝi, Ooi, Oojama, Ooŝima, Osida, Ossaka (418), Osugi (420), Ren, Sakai, Sasaki M. (466), Sasaki T. (465), Segaua, Siba, Simose, Sinnura, Suzuki, Ŝibajama, Sigemacu, Ŝimizu, Ŝimomura (520), Ŝindo (521, 663), Takahaŝi, Takakusu, Takeuči, Toki, Tooguu (533), Torii, Tukimoto, Ucnomija, Ueda H., Ueda K., Ueno T. UraUeti, Yagi, Yanagida.

Jugoslavujo : Agorič, Andonovič, Bedekovič, Bertoli, Bubalo, Buk, Dobrave, Domac, Homar, Janjič, Jovanovič, Jozičič Klajič (302), Kolar, Koser, Kun, Lichtenwallner, Lisac, Maruzzi (357), Modrijan, Novljan, Petrovič, Puhalo, Rakuŝa (444), Rotkvič (458, 624), Solovjev (500), Staničič, Stefančič (509), Špicer (523), Tomac, Velnič, Zivanovič.

Latvujo : Aizpuritis, Čače (136), Grots, Indra (266), Jaunvalks, Kadik, Kazoks, Kikauka, Kurzens (316), Libeks, Strazds, Szmurlo (518), Stammers (524). Estraro de Lates (nur bildo 322).

Litovujo : Balčiunas (35), Butkus, Dambė, Dambrauskas (139), Klimas, Mačernis, Medem (362).

Nederlando : Aarse, Alberda, Alings (9), Baart (29), Baas, Benink, Blokker, Brouwer, Bruijn (94), Bruin, Bulthuis (100), Coomans, Damen, De-genkamp (142), Dokkum 389, Donker, Droogendijk, Dufrenne, Faulhaber, Haan, Hartog, Heck, Heilker (235), Hendriks, Homulle, Isbrücker J. R. G., Isbrücker J. C. (273, 138. b), Israëls, Klerk, Kloek (293), Korte (307), Kramers (309), Krijt, Leeuwen (330), Linnebank, Lüneman, Lutkie, Manders (361), Mees, Meijer, Minke, Moreau (388), Niesten, Nutters (405), Onnen, Poel,

Preller, Romein, Roskes D. (457), Schendeler (471), Sevenhuijsen, Smarius, Smulders, Straaten, Telling (529), Uitterdijk (545), Versteeg-Grafdijk, Vijver, Vink, Waart, Westen, Woud, Ysselstein, Ziermans, Zon (582, 613), Zwet.

Norvegjujo: Allum, Arnessen (16), Bonnevie (76), Bugge Paulsen (97), Bye, Christensen, Christie, Davidson, Finholt, Hageler, Klingenberg, Midthus (374), Muribo (393), Økland, Olden, Rian, Riefling, Schibbye, Schjerve (473), Sletterød, Wiig.

Pollando: Alfus (8), Baudouin (44), Belmont (47, 86), Bevrman, Blassberg, Braun, Brzostowski (95), Bujwid (99, 625), Cense (111), Czubirsky (127), Dratwer, Dreher (154), Ender, Essigman, Fels, Fethke, Forge (193, 164), Furmanik, Grabowski (224, 222), Greffkowiec, Grenkamp (227), Günther (229), Hempel, Hodakowski (246), Ivanski, Kabe (294), Karolczyk (299), Kelter, Kowalski, Kozłowska, Krenicki, Kriss, Kronenberg (310), Kuhl, Kutscher, Lazica, Lejzerowicz (332), Litauer (342), Medrkiewicz (363), Mikolajski, Mildwurf, Nels, Oberrotman, Pfeiffer, Prengel, Pruski, Róbin W. (453), Rosenstock, Rudnicki, Silbernik, Sygnarski, Szapiro (519), Teichfeld, Waldenberg, Wasniewski, (559), Weinstein (563), Wiener (nur klišo, 565), Wierzchowski-Korczak, Wiesenfeld (564), Zakrzewski (570), Zamenhof Ad. (138 b, 572), Zamenhof Al. (573), Zamenhof Aug. (nur klišo, 588), Zamenhof Fa. (nur klišo, 587), Zamenhof Fe. (138. c, 574), Zamenhof K. (86, 575, 584), Zamenhof Le. (577), Zamenhof Li. (576), Zamenhof L. L. (86, 584, 589, 592, 734), Zamenhof M. (585), Zamenhof Rosalja (nur klišo, 586), Zamenhof S. (578), Zawada (580).

Portugalujo: Almeida (10), Carreira (110), Carvalho, Henrique, Horner (248, 694), Lobo, Nunes, Silva.

Rumanujo: Amon, Beraru, Cseh (123), Firu, Fischer (185), Fischer-Galati (184), Frollo, Giuglea, Halász, Harabagiu, Jonescu-Capatana, Josif, Kimel, Morariu E., Morariu T. (387, 624), Nikolau, Pragano, Robin G., Savopol, Teodorescu, Timuš, Wurbrandt, Zauner.

Ruslando: Ablaŝidze, Abesgus, Aisberg, Andrejev, Baŝteev, Belogorcev, Blinov, Borisov (81), Borovko, Borovko-Čajkovskaja (80), Brandt (89), Breslau, Cywinski, Davidov (141), Demidjuk (147), Deŝkin, Devjatnin (150), Diakonov, Dmitrijev, Drezen (158), Eydelnanth, Ejdelman, Erjuhin, Eroŝenko (174), Evstifejev, Filipov, Filippov, Fiŝer (187), Frenkel, Gabriel, Gernet (214), Gogeliani, Guminski, Hohlov (245), Habibi, Hajan, Incertov, Ivanov, Ivn (708), Izgur (277), Jodko, Javoronkov, Jeleznjakov, Jeltov, Jirkov, Jukov, Kabanov, Kazi-Girej, Koch, Kofman (303), Kolobaŝkin (305), Kotzin, Kuzjma, Kuzmič (319), Kuznecov, Levenzon, Lidin (336), Liljer, Lisičnik (341), Marr, Miĥalička (708), Miĥalski (375), Mirski, Mučnik (391), Nedoŝvin, Nekrasov (396), Obrastsoff, Ostanievič, Ostrovskij (80, 422), Pavlov, Petrajevskij, Pocolujevskij, Poljauskij (436), Poltavskij, Postnikov A., Postnikov F., Potapčik, Rešetin, Rublov (461. a, 708), Saĥarov (464), Seleznjov, Seriŝev (489), Seriŝeva, Sevak, Snejko (498), Solovjev (500), Spiridovič (505), Stefan, Stojan (512), Sveŝnikov, Szmurlo (518), Šarapova, Šatunovskij, ŝčavinskij, ŝidlovskaja, ŝidlovskij, ŝirjaev (Ald. 1.) Tenisov, Tiflisano, Tolstoj, Usmanov, Valentinov (nur klišo, 547. a), Valkov, Varankin, Vejtelc, Viktorov-Čehovič (551), Wahl, Zamjatnin (nur klišo, 571).

Svedujo: Adamson (2), Adelsköld, Agren, Ahlberg (3), Ahnfeldt (4), Andersson, Backman (31), Bonde (75), Collinder, Dahl, Engholm (164), Eriksson B. (170), Eriksson E. (171), Fröding, Gyllsdorf, Hakansson, Halldor (237), Helsing, Henriclundquist, Jansson S. (278), Jansson S. O., Johansson C. J. (283), Johansson G. E. (282), Julin (286), Kihlberg, Langlet (80), Larsson (328), Lavén, Lindhagen (339), Lundgren, Lundström, Malmgren (351), Malmkvist (352), Morariu L. (386), Morariu T. (387), Nordlund, Nylén (406), Ohlsson, Örn, Pehrsson, Ragnar, Roesel, Rosenberg, Runeberg, Rinstedt, Sandström, Sjögren, Skog, Söderberg (499), Sussmuth (515),

Svanbom, Svantesson (516), Thilander H. (531), Thilander K., Thilander V., Thisell, Torbjär, Winberg (566), Ysner, Zeidlitz.

Svislando: Borel Jean (79), Bouvier, Dor (152), Forel, Fridöri, Hodler (243,), Horner (248, 694), Jakob (279, 281, 624), Jayet, Kreuz (138 b, 312, 610, 624, 625), Kürsteiner (317), Maeder (348), Naville, Perrenoud, Privat (86, 138 b, 439, 440, 624), Rotach, Saussure (468), Schmid (474), Schneeberger (476), Spielmann (504), Stettler, Stroele (513, 624), Uhlmann.

Usono: Adams (1), Baff, Baker, Barrett, Benson (52), Bonesper (554), Briggs, Christensen, Fazel, Frost, Geoghegan (213), Harvey, Hetzel (236), Horn, Jackson, Jaffe, Kenngott (291), Lee, Lowell, Morris (389), Morton, Parrish (425), Payson, Phillips, Postnikov F., Reed E. C., Reed I. V., Rogers, Saville (469), Scherer (472), Scott, Silbernik (492), Stancliff, Stockton, Sussmuth (515), Talmeý, Twombly, Vinzent, Weder (561), Wendell, Wharff, Witt.

Diversaj ekster Eŭropo: Ajayi, Aldridge, Bardoulet, Beauchemin (59), Benšahar, Casas, Giner, Huyng, King, Laĥovicki, Liem Tjong (338), Muĉnik, Mustapha, Nemseĉi (397), Obrastsoff, Richard, Sepulveda C. (488), Sinha (497), Solis, Sidani, Vaghinak, Vaughan, Villareal (552), Williams.

b, Laŭ temoj:

Enciklopedioj ĝenerale ne havas apartajn indeksojn, ja mem la Enciklopedio estas granda indekso. Tamen, por helpi al la studantoj, ni pretigis indekson ankaŭ laŭ temoj. Tiu ĉi indekso ne celis esti kompleta, ĝi ne aidudas al detaloj, kiujn entenas la biografioj kaj estas montritaj nur la pli ĉefaj trovokoj pri la temoj. La litero a montras la unuan, la litero b la duan kolonon de la paĝo.

Blinduloj: 91, 181, 401 b. — Bildoj: 64, 65, 66, 67.

Fakaj artikoloj: 16 a, 21 b, 33, 54 b, 55, 56 a, 135 b, 136, 137, 143 b, 200 a, 270 b, 271 a, 336 b, 359 b, 362 b, 373 a, 380 b, 400, 430, 431, 432, 441 b, 442, 456 a, 457, 458, 460, 470, 473 b, 474 a, 484, 485, 486 b, 487, 488 b, 489 a, 491, 495, 496, 498 b, 509, 519, 531 a, 532, 537 b, 538 b, 542 a, 544 a, 546 a, 554 a, 555, 558, 559 a.

Fervojo: 27 a, 29 b, 140 a, 181 a, 259 b, 260 a, 401 a. Bildo: 179.

Gazetoj: Krom la detala artikolo v. la laŭlandajn kaj laŭfakajn artikolojn kaj la apartajn artikoletojn pri ĉiuj iom gravaj gazetoj. Bildoj: 11, 22, 48, 91, 92, 102, 133, 135, 172, 182, 194, 199, 200, 201, 202, 203, 204, 205, 217, 226, 240, 242, 250, 259, 271, 272, 284, 285, 608, 631, 658, 659, 667, 691, 693, 705, 707, 710, 731, 732, 748.

Geedziĝoj. Bildoj: 206, 207, 208, 209, 210, 211.

Internacia historio de Esperanto: 14 a, 16 b, 18 b, 49 a, 50, 51, 52, 59 b, 60 a, 79, 82 a, 87 b, 88, 89 a, 104 b, 105, 106, 113 a, 117 b, 118 a, 123 b, 124, 125 a, 163, 164, 165, 203, 211, 223 a, 240 b, 241, 242, 243, 247, 248, 250, 263 b, 264 a, 279 a, 285 a, 287, 297, 298, 299, 300, 301, 302, 305, 306, 339 b, 340, 311, 342, 343, 344, 363 b, 364 a, 371, 372, 421 a, 424 b, 425, 426, 427, 433, 455, 496 b, 501, 502, 503, 512, 513, 514, 515, 516, 517, 518, 531, 546, 547, 548, 550, 551.

Internaciaj lingvoj (krom Esperanto): 20 a, 40 a, 49 b, 75 a, 102 a, 221 a, 235, 236, 237, 238, 246 b, 249, 250 a, 413, 420, 526 b, 530 b, 563.

Komercio: 68 b, 156 b, 157 a, 180 b, 258, 259 a, 286. Bildoj: 626, 627, 628.

Kongresoj. Bildoj: 86, 138 b, 138 c, 216, 257, 610, 615, 616, 617, 618, 619, 620, 621, 622, 623, 624, 625, 629, 630, 665, 669, 699.

Laborista movado: 32 b, 33 a, 70 b, 91 b, 103 a, 123 a, 158 b,

159, 160, 181 b, 182, 194 b, 195, 196 a, 230, 252 b, 253 a, 296, 360, 361, 383 a, 388 a, 404, 405 a, 454, 455 a, 464, 488, 526 b, 527, 554.

Lernejoj: 27 a, 30 b, 64, 65 a, 68 b, 70, 75, 96, 129 a, 140 a, 152, 153 b, 154, 179 b, 180 a, 194 a, 201, 219 a, 243 b, 244, 245, 257, 258 a, 293, 402 a, 405, 435 a, 436, 519, 526, 527 b.

Libroj, broŝuroj. Bildoj: 55, 56, 88, 98, 140, 143, 173, 183, 247, 260, 261, 262, 267, 298, 662, 666, 666 b, 675, 696, 697, 703, 704, 724, 728, 735, 737, 751, 753.

Medicino: 179 a, 400 b, 401 a.

Polico: 30 a, 180 b. Bildoj: 671, 672, 673.

Poŝto: 66 a, 181 a. Bildoj: 91, 134, 676, 677, 678, 679, 680, 681, 682, 683, 684, 685, 686, 687, 688, 689.

Propagando. Bildoj: 23, 24, 92, 168, 186, 698, 699, 700, 701, 702, 706, 733, 746.

Radio: 30 a, 95 b, 102, 155 b, 156 a, 178 b, 260 a, 403, 404 a, 417 a, 447 a, 450 a, 526 b. Bildoj: 183, 695, 736.

Religioj: 26 b, 29 a, 37 a, 49, 72, 96 b, 109, 110, 182 b, 238 b, 239 a, 251 a, 259, 281, 282, 283, 284 a, 285, 297 b, 359, 375 b, 384 b, 388 b, 402, 418, 422, 423, 424 a, 451 b, 455 b, 497 b, 538 b. Bildoj: 167, 609, 611, 612, 614, 657.

Stenografio: 183 a, 251, 260 a, 403 a. Bildoj: 722, 725, 726, 727.

Stratoj: kaj monumentoj. Bildoj: 39, 61, 62, 63, 85, 108, 108 a, 108 b, 131, 132, 138 a, 157, 160, 222, 713, 714, 715, 716, 717, 718, 719.

Turismo: (fremdultrafiko): 29 a, 95 b, 145 b, 146 a, 156, 231, 259 a, 292 b, 527 b. Bildoj: 739, 740, 741, 742, 743, 744, 748.

Virinoj: 91 a, 134 b, 135 a, 405 a.

Zamenhof: 114 b, 115, 122 a, 306 b, 376 b, 377.



GRAVAJ PRESERAROJ KAJ ALIAJ ERARAJ

Paĝo kaj linio:		Gusta teksto:
9 desupre	9	artikolo mem
11 b »	1	k. c.
25 a indikvorto		Aŭstralio
25 b indikvorto		Aŭstria Esperantisto
29 a desupre	5	Steyr
29 a desupre	7	Schober (anstataŭ Buresch)
36 a »	9	lin
61 b demals.	18	1918
126 b »	15	Peltier
126 b »	9	1921 H. F.
126 b »	2	eklezio
127 a desupre	1	kaj akiris trifoje
150 a demals.	15	2000 (anstataŭ 10000)
167 a desupre	10	Kiferman
168 b »	5	ne supozus
174 a demals.	12	Piotrków
178 b »	25	atentata
179 b desupre	15	transloĝigis
179 b demals.	27	Neŭrologio
181 a desupre	3	ĝis jul. 1914
181 b demals.	7	en 1933 kaj 1934 krom la naciaj ankaŭ
183 a desupre	2	G. Moch
232 b desupre	18	Szverle
271 a »	11	Tadakacu
285 a post	7	Noto de la red. Kenelm Robinson estas pseudonimo de originala Esperanto-verkisto.
493 a demals.	8	A d j e k t o

La listo de la eraroj ne estas kompleta. La I-a Volumo de la Enciklopedio aperis la 21-an de junio 1934, do antaŭ 11 monatoj kaj dum la daŭro de preskaŭ unu jaro la recenzantoj kaj legantoj komunikis al ni relative tre malmultajn erarojn kaj mankojn.